

Alessandro Manzoni

La Gefianĉoj

Milania historio el la 17-a jarcento

Elitaligis kaj prinotis Battista Cadei



Alessandro Manzoni

La Gefianĉoj

Milania historio el la 17-a jarcento

Elitaligis kaj prinotis Battista Cadei

Reteldono 2015

Re-eldono 2014

Originala titolo: *I Promessi Sposi*

Alessandro Manzoni
La Gefianĉoj
Originala titolo: I Promessi Sposi

Elitaligis kaj prinotis Battista Cadei
Reteldono 2015

www.ueci.it/eldonoj

Ĉiuj rajtoj ĉe la tradukinto.
Eblas elŝuti la tekston ne profitcele.

Unione Esperantista Cattolica Italiana (U.E.C.I.)

ANTAŬPAROLO

Tradukinde

Esperantigo de naciaj beletraĵoj akompanas la tutan historion de la internacia lingvo, ek de ties iniciatoro, L.L. Zamenhof, kiu tradukis diversajn nacilingvajn verkojn, por provi ĉu (kaj pruvi ke) la Lingvo Internacia vere taŭgas por ĉia literaturaĵo.

Kaj ne mirinde, ke oni strebis esperantigi precipe ĉefverkojn, pro tio ke ili principe apartenas al la tuta homaro, kaj do meritas internaci-lingvan version. Koncerne la italan literaturon, esperantigita estas ties poezia ĉefverko, nome «La Dia Komedio» de Dante (1265-1321); sed nur fragmentoj de nia proza juvelo, nome «La Gefianĉoj» de Manzoni. Tial mi mem aŭdace provis tion fari.

La verkisto kaj ties epoko

La vivo-tempon de Alessandro Manzoni (el Milano, Italujo, 1785-1873) markis gravaj historiaj eventoj: la franca revolucio (1789-1795), la konkeroj de Napoleono (1796-1814) kaj diversaj naciaj sendependismaj movadoj. Kvankam edukite kristane, Manzoni junaĝe forlasis la religion; sed dum sia restado en Francujo (1805-1810), post sia edziĝo kun tre pia kalvinana virino, li komencis interesiĝi pri moralaj kaj religiaj temoj, kaj pli poste fariĝis fervora katoliko.

Tiun epokon influis diversaj kulturaj movadoj. Unue la klerismo, kiu ludis gravan rolon en la franca revolucio, kaj akcelis demokratismajn movadojn. Laŭ la klerisma pensomaniero, la homa racio nepre faligos ĉiajn superstiĉojn

kaj dogmojn, tiel ke estontece la individuan vivon gvidos racieca, laika moralo, kaj la socion regos demokrata sistemo. La Napoleonan periodon markis la nov-klasikismo, kiu unuflanke taksis la grekan kaj latinan mondon modelo de estetiko, aliflanke iel pravigis la maldemokratitan reĝimon de Napoleono. Sed la movado, kiu plejmulte influis nian aŭtoron, estis la romantikismo, kiu reagis kontraŭ la klerisma abstrakta racieco kaj la nov-klasikisma imitema estetiko. Romantikuloj ŝatas la «rezonojn de la koro», nome la homan sentemon, la spiritan kreivon, la transcendajn valorojn, ofte laŭ laika spiriteco, foje (kiel ĉe Manzoni) laŭ kristana sento, ĉerpante ilin el la profundo de la individua spirito kaj el la popolaj tradicioj kaj folkloro.

La romano kaj ties historia fono

Manzoni publikigis la romanon unuafoje en 1827, sed dum pluraj jaroj li ŝanĝetis kaj poluris ĝin, tiel ke ties definitiva eldono, aperinta en 1840, estas rimarkinde malsama ol la unua. Laŭ romantika pensomaniero, li verkis popolan romanon, kies kanvaso disvolviĝas laŭ simpla skemo, trovebla ĉe multe da popolaj literaturoj: bonvirta, malriĉa gefianĉa paro jam estis geedziĝonta, kiam neatendite kontraŭ-leviĝis amaso da persekutoj kaj katastrofoj, kiuj ŝajnis neniigi tiun revon; fine tamen la du bonmoruloj per la helpo de homoj kaj la graco de Dio sukcesis geedziĝi, kaj ek de tiam ili vivis... preskaŭ feliĉe. Mi diras «preskaŭ», ĉar sub ŝajna simpleco kuŝas pensema meditado pri l' homara vivkondiĉo, ties revoj kaj realoj, valoroj kaj vantaĵoj, noblaĵoj kaj malicoj, kio rezultigas tiun ĉi romanon tutmonda ĉefverko.

Kiel literatura ĝenro, temas pri historia romano. La rakontitaj eventoj estas kadritaj ĉirkaŭ la jaro 1630-a, en la Milana teritorio, tiam sub Hispana okupacio. Sed la oficiala historio kun siaj altnivelaj roluloj (suverenoj, nobeloj ktp.) konsistigas nur la fonon, dum la ĉefan rolon ludas tute simplaj popolanoj. Pli precize: en la romano troviĝas historiaj personoj (ekz. guberniestro Don Gonzalo de Cordova kaj ĉefepiskopo Federigo Borromeo); aliaj roluloj (ekz. kapuceno Cristoforo, monakino Gertrude, la Nenomito) estas duonhistoriaj: ili vere ekzistis, sed en la romano ili aperas sub alia nomo, kaj kun faroj grandparte elpensitaj. La du gefianĉoj, nome Renzo kaj Lucia, kaj iliaj aventuroj, estas tute elpensitaj.

La verko prezentas longajn ekskursojn koncerne la tiaman kulturan kaj soci-politikan situacion. Nuntempaj historiistoj ne tute konsentas kun la vidpunkto de Manzoni. Sed la valoro de la verko konsistas en tio, ke ĝi fakte bildigas la ĉiatempan kaj ĉialokan homaron.

Moralo kaj religio

Ne eblas kompreni tiun ĉi romanon, se ignori ties moralan kaj religian fonon. Konvenas do ĝin konsideri, eĉ se oni pri ĝi ne konsentas. Ne intencante ĉi tie verki eseon, mi nur mencias, ke Manzoni konsideras objekto de sia verkado la veron (li deiras el la historio, kaj primokas la mitologion), kaj ties celo la bonon. Oni ne tamen imagu la romanon plena de pedantaj moralismaj konsideroj. Manzoni preskaŭ ĉiam observas kaj bildigas la homajn sentojn kaj kondutojn kun ridetanta kaj apenaŭ perceptebla ironio. Kiam li kvalifikas momenta

frenezaĵo la frazon de Renzo: «en ĉi-mondo ja estas justeco, fin-fine!»; aŭ li diras ke, por fari militon, oni bezonas pravigajn rezonojn (legu: pretekstojn), «ĉar militoj senpravaj estus maljustaj»; aŭ ke «la ebleco malami kaj malamiĝi, eĉ ne konante sin reciproke» estas privilegio de la homraso; aŭ li demandas «kiu do vivtenus malriĉulojn, se riĉuloj ne ekzistus?», oni ne imagu lin filistra kaj cinika: li nur evidentigas, kun ŝajne indiferenta ironio, la moralan mizeron de l' homoj ĝenerale.

Kongrue kun la romantika pensomaniero, popolanoj ludas gravan rolon. Ĝenerale temas pri honestuloj kun komuna prudento kaj saĝo, kiuj tamen devas suferi perfortojn kaj ĉikanojn de arogantaj potenculoj, kiuj ĝuas faktan senpunecon spite ĉiajn leĝojn. Nur malmulte da gravuloj (kiel monako Cristoforo) aŭdacas malriĉulojn defendi. Aliflanke la verkisto rigardas la popolon kun supereco, kaj taksas ĝin malracia. Ekzemple, dum la ribelo proteste kontraŭ malsato, la popolo stultaĉe disĵetas kaj fuŝas farunon kaj panon, detruas bakejojn kaj bakilojn, laŭdegas kancelieron Ferrer, kiu fakte pliigis la malsategon, kaj volus linĉi la tute senkulpan proviant-administranton. Ne estas esperinde, ke la socio pliboniĝos, ĉar «lupo ne manĝegas lupon», t.e. potenculo neniam kondamnos alian potenculon.

La Manzoni-an moralon gvidas kristana idealo, kiu manifestiĝas per fido je la Dia Providenco, kiu fine kondukos bonulojn al feliĉa sukceso. Sed malantaŭ tiu ĉi ŝajne naiva koncepto, Manzoni majstre bildigas la vivo-realon, kia nur granda verkisto kapablas ĝin prezenti. Koncerne religion, oni ne imagu lin bigota piulo: li prezentas ekzemplojn kaj de kohera kaj de misa, kaj eĉ karikaturo kristaneco. Ni komencu

per ĉi-lastaj:

- principino Gertrude, kontraŭvola monakino, vivas malvirte, kaj eĉ partoprenas en murdo;

- pastro Abbondio, tute senmalica, sed tre timema kaj fakte egoisma, estas tute cedema al potenculoj anstataŭ defendi persekutatojn laŭ sia pastra devo;

- Damo Prassede en sia pieco kaj bonfaremo estas tute maldiskreta kaj entrudiĝema.

Aliflanke laŭ Manzoni la kristana idealo ne estas nura utopio, ĉar ne mankas homoj, kiuj strebas ĝin kohera praktiki. Tiaj estas, ekzemple:

- monako Cristoforo, malgraŭ tio, ke en sia junaĝo li murdis viron dum interbatiĝo;

- la Nenomito, iama potenca bandito, kiu, konvertiĝinte, fariĝis nearmita defendanto de persekutatoj;

- episkopo Federigo, kiu multege bonfaris dum la terura pesto.

Entute troviĝas en la romano ampleksa bildigo de plej varia homaro: infanoj kaj olduloj, viroj kaj virinoj, kompatindaj almozetantoj kaj riĉegaj potenculoj, homoj naivaj aŭ ruzaj, hipokritaj aŭ sinceraj, fiaj aŭ bonkoraj, delikataj aŭ krudaĉaj ... La historia scenejo, kiel ni diris, koncernis la 17-an jarcenton; la aŭtoro malkaŝe aludis sian epokon, nome: 19-an; sed... ĉu io ŝanĝiĝis en la jarcento 21-a?

La gefianĉa paro

La religi-moralaj valoroj kompreneble koncernas ankaŭ la du ĉefrolulojn. Lucia estas knabino kun delikata konscienco

kaj profunda religio, tiel ke ŝi neniam dirus eĉ plej etan mensogon, des malpli ŝi farus ion kontraŭ siaj rigoraj principoj. Ŝi amegas Renzon, sed per amo plena de pudoro, kiu evidentiĝas el ŝiaj oftaj ruĝiĝoj kaj mallevo de okuloj. Tia pudoro, simila «...al timo de infano, kiu tremas en mallumo, nesciante kial», nia (okcidenta) malpruda pensmaniero ne tute (aŭ tute ne) ŝatas. Literaturaj kritikistoj taksas tion diversamaniere: iuj opinias Lucia-n ideala, sed entute malvarma rolulo; aliaj male rimarkas, ke ĝuste ŝia delikata spirita sentemo krizigis la Nenomiton, afero kiu turnis la eventojn direkte al feliĉa elnodiĝo.

Renzo siaflanke estas honesta popolano, kiun misaventuroj igis aŭdaca kaj elturniĝema. Lia komuna prudento akre reagis kontraŭ maljustaĵoj kaj ĉikanoj, kiujn laŭvice li trovas ĉe pastro, advokato, nobeloj, gastejestroj, ribelantoj, publikaj instancoj. Malgraŭ siaj firmaj religiomoralaj principoj, li opinias ke, se necese, oni rajtas forigi skrupulojn. Eĉ kun Lucia, kiun li amegas, Renzo kondukas kolerege, por ŝin devigi provi geedziĝon laŭ vojo valida sed ne tute regula, konsidere ke la ĝusta estas malprave barita. Malamikojn pardoni estas grava, sed malfacila kristana devo; kaj nur la spirita aŭtoritateco de monako Cristoforo sukcesos, ne senpene, persvadi Renzon pardoni eĉ la fian Don Rodrigon, ĉefkaŭzon de liaj malfeliĉoj.

La lingvo

Teorie «la dudek kvin legantoj» de «La Gefianĉoj» estas popolanoj; tial Manzoni strebis al lingvaĵo nobla sed facile komprenebla. Ĉi-cele li adiaŭis la tiaman eliton, latineskan kaj

retorikan prozon, por imiti la konversacian lingvon de la kleruloj de Florenco, naskiĝurbo de Dante kaj lulilo de la itala lingvo. Foje tamen Manzoni citas barokajn tekstojn, garnitajn per erudiciaj klasikaĵoj kaj mitologiaĵoj; sed tion li faras ironie, por karikaturo la bombastan stilon de la deksepa jarcento, falsan kaj malproksiman de la popolo. Ĉio tio kongruas kun la romantika idealo, laŭ kiu verkistoj strebu ne al retorikaj rafinaĵoj, ŝatataj de kleruloj, sed al simpla popola lingvaĵo. Fakte la romano de Manzoni estas taksata modelo de la moderna itala prozo.

Tiu ĉi esperantigo

Manzoni reviziis kaj poluris sian romanon dum pli ol dek jaroj. Mia tradukado, kies rezultaton vi havas ĉe-mane, daŭris duoble. Mi komencis ĝin en la okdekaj jaroj de la lasta jarcento, kiam, komisiite pri la E-programo ĉe Radio Vatikana, mi bezonis plibonigi mian lingvan nivelon, kaj tial mi komencis ekzerce traduki tiun ĉi klasikan ĉefverkon. Baldaŭ mi konstatis, ke ĝia stilo estas malpli popola ol mi supozis, ke ĝia ŝajna simpleco estas frukto de longa ellaborado, kaj la subtilaj nuancoj de la priskribitaj mienoj kaj sentoj kaj pejzaĝoj kaj movoj kaj svarmoj subhavas tiel fajnman bravuron, ke mi plurfoje estis tentata rezigni mian provon. Sed ĉiuforte mi la tenton supervenkis kaj «guton post guto» atingis la finon.

Kongrue kun la (preskaŭ) popola stilo de la originalo, mi strebis al lingvo klara kaj simpla. Trovi ĝustan ekvilibron inter lingva fideleco kaj internacia ĝuebleco, foje rezignante fajnajn preciozaĵojn, eĉ kiam la nova PIV ilin pravigas: jen la granda

defio. Por tion plenumi mi nepre bezonis, kaj fakte ricevis, helpon de diverslingvaj samideanoj. Kompreneble la konkreta solvo de ĉiu aparta kazo estis mia, sed ĉiun objeton kaj konsilon mi ĉiufoje serioze konsideris. Entute vi rajtas konkludi, ke pri ties plibonigo dankindas helpintoj, dum pri eventualaj difektoj... kulpas la tradukinto. Fakte neniu pli ol mi konscias, ke, spite ĉian diligentecon, verŝajne troviĝos en ĝi kritikindaj solvoj kaj eĉ eraroj. Malgraŭ tio mi plu estas konvinkita, ke tiu ĉi provo estis farinda.

Komence mi intencis meti malmulte da piednotoj; sed pli poste mi konsideris ke eĉ la originala teksto bezonas klarigojn por italoj, kaj konkludis ke des pli tion bezonas internacia legantaro. Tial mi provizis la tradukon kaj per piednotoj, kaj per fina glosaro (kiun bona konanto de la vortaro povos grandparte preterlasi).

Mi klopodis eviti neologismojn, sed da ili mi devis allasi almenaŭ du, nome *monatio* kaj *landkneĥto*. Aliajn vortojn, ekz. *bravulo*, *kriaĵo*, *gardanto*, *ŝmiristo*, *avertisto*, mi uzis kun speciala nuanco. Klarigoj pri unuj kaj aliaj troveblas en la glosaro.

La (verajn aŭ fikciajn) citaĵojn, en la bombasta, baroka stilo, kiu karakterizis la italan literaturon en la 17-a jarcento, mi klopodis esperantigi per diversaj artifiko, inter kiuj la forlaso de la artikoloj, kaj la uzo de la litero h anstataŭ supersignoj.

Dankinde

Tiu ĉi libro ne povus aperi sen la helpo kaj kuraĝigo de multe da samideanoj, tiel ke nun estas al mi neeble listigi ĉiujn, kiuj diversmaniere kunlaboris por ĝin revizii kaj publikigi (per la merito-plena Itala Esperanto-Federacio). Malgraŭ la risko de riproĉindaj forgesoj, mi volas mencii almenaŭ jenajn (en alfabeto ordo): Renato Corsetti (Italio), Antonio De Salvo (Italio), Michela Lipari (Italio), Nakamura Masami (Japanio), Vinko Ošlak (Aŭstrio), Carlo Sarandrea (Italio), Lorenzo Tomezzoli (Francio). Al ili, kaj al ĉiuj havigintaj reviziojn konsilojn sugestojn, mi esprimas ĉi tie plej elkoran dankon, se ne de la tuta esperantistaro, almenaŭ de la «dudek kvin» legontoj.

Battista Cadei

Elparolo de “C” kaj “G” en la itala

Por ebligi proksimuman elparolon de la italaj propraj nomoj, anstataŭ prezenti la tutan regularon (temas pri ortografio relative fonetika, sed ne tute simpla), nur pri “c” kaj “g” jen kelke da reguloj (rimarku, ke en la ekzemploj ankaŭ aliaj reguloj estas aplikitaj):

1. it. *ca, co, cr, cu*: elparolu: *ka, ko, kr, ku*.
— Ekz.: it. *Cristoforo*: elp.: *Kristoforo*; it. *Lodovico*: elp.: *Lodoviko*; it. *Menico*: elp.: *Meniko*; it. *Macario*: elp.: *Makarjo*; it. *Carlo*: elp.: *Karlo*; it. *Carlandrea*: elp.: *Karlandrea*; it. *Como*: elp.: *Komo*; it. *Lecco*: elp.: *Lekko*; it. *Pescarenico*: elp.: *Peskareniko*.
2. it. *ga, go, gr, gu*: elparolu: *ga, go, gr, gu* (tute same kiel en Esperanto!).
3. it. *che, chi*: elparolu: *ke, ki*.
— Ekz.: it. *Michele*: elp. *Mikele*; it. *Achillini*: elp.: *Akillini*; it. *Chiodo*: elp.: *Kiodo*.
4. it. *ghe, ghi*: elparolu: *ge, gi*.
— Ekz.: it. *Borghese*: elp.: *Borgeze*; it. *Ghirardelli*: elp.: *Girardelli*.
5. it. *ce, ci*: elparolu: *ĉe, ĉi*.
— Ekz.: it. *Lucia*: elp.: *Luĉia*; it. *Cecilia*: elp.: *Ĉeĉilja*; it. *Felice*: elp.: *Feliĉe*.
6. it. *ge, gi*: elparolu: *ĝe, ĝi*.
— Ekz.: it. *Gertrude*: elp.: *Ĝertrude*; it. *Gervaso*: elp.: *Ĝervazo*; it. *Egidio*: elp.: *Eĝidjo*; it. *Ambrogio*: elp.:

Ambroĝo.

Konvenas aldoni: it. *Perpetua*: elp.: *Perpetŭa*.

B.C.

ENKONDUKO

«*Historion*¹ oni vere difini povas eminenta milito kontraŭ Tempon, ĉar, forŝirante el la mano de ĉi-lastaj jarojn, ties kaptitojn eĉ jam kadavrigitajn, ĝi ilin revivigas, revuas kaj denove dismetas porbatalo. Sed eminentaj Ĉampionoj, en tia Turnirejo rikoltantaj Palmojn kaj Laurojn,² forrabas nur nurajn plej luksajn kaj brilajn predajhojn³, kaj per sia inko balzamas⁴ nur Heroajhojn de Princoj kaj Potenculoj kaj kvalifikitaj Eminentuloj, per subtilega kudrilo de inĝenieroj alkudrante fadenojn el oro kaj silko, kiuj formas eternan brodaĵon⁵ el glorozaj Prodaĵoj. Tamen al mi, en mia sentaŭgeco, ne licas levighi ĝis tiaj temoj kaj dangheraj sublimajhoj, cirkulante tra Labirintoj de Politikaj manovroj, kaj sonorego de militaj Trumpetegoj: nur tial, ke mi ekhavis sciigon pri eventoj memorindaj, kvankam ili koncernis homojn man-laborajn kaj sen-rangajn, mi entreprenas pri ili memoron postlasi al Posteuloj, kaj fari pri ĉio pura- kaj simpla-maniere Rakonton aŭ Raporton. En ĝi oni vidas en malvasta Teatrejo plorindajn hororajn Tragediojn, kaj Scenojn el grandioza malvirteco, kun interaktoj el virtecaj

¹ La unuaj linioj estas intence komplikaj kaj garnitaj per multe da erudiciaĵoj, pro tio ke Manzoni fikcias, ke li ne verkas, sed nur kopias anoniman manskriban historion el la 17-a jarcento, verkitan laŭ la tiama arkaika, baroke bombasta stilo, kiun ni esperantigis i.a. per forigo de artikoloj kaj per uzo de *h* anstataŭ supersignoj.

² *Ĉampionoj... Laurojn*: ‘ĉampionoj’ (t.e. historiistoj), en ‘turnirejo’ (t.e. vetbatal-kampo) ĝenerale gajnas ‘palmojn kaj laŭrojn’ (t.e. triumfojn), nur traktante pri nobeloj kaj eminentuloj; male en tiu ĉi verko ĉefrolas homoj ‘man-laboraj kaj sen-rangaj’ (t.e. popolanoj).

³ *predajhojn*: milit-rabaĵojn.

⁴ *balzamas*: gardas senputraj.

⁵ *brodaĵon*: desegnaĵon kudre faritan sur ŝtofo.

Entrepreneoj kaj anghelecaj bonajhoj, opoziciaj al agajhoj diablecaj. Kaj vere, se konsideri, ke chi-niaj chirkaulokoj kushas sub Shirmego de Katolika Regho nia Sinjoro, kiu estas tia neniam subiranta Suno; kaj ke super ili brilas per reflektita Lumo kvazau neniam malkreskanta Luno, Heroo el nobela Gento, kiu portempe lian rolon ludas⁶; kaj Moshtegaj Senatanoj, kvazau fiksj Steloj; kaj aliaj Respektendaj Magistratanoj, kvazau vagaj Planedoj disvershas lumon chien ajn, per tio konsistigante nobelegan Chielon, ne eblas do trovi alian kauzon de jeno, ke oni vidas tian Chielon shanghita al infero el tenebrozaj farajhoj, malvirtajhoj kaj kruelajhoj, de temeraraj homoj ade multobligataj, tial nur diablaj arto kaj sorchado povas tion fari, pro tio ke homa malico per si sola ne povus rezisti al tiom da Herooj, kiuj per okuloj de Argo kaj brakoj de Briareo⁷ ade klopodadas por publikaj avantaĝhoj. Tial, priskribante tiun chi Rakonton, okazintan en tempo de mia verda sezono, kvankam personoj, kiuj tie rolas, plejparte malaperis el Scenejo de Mondo, ighinte tributajho al Parcoj,⁸ oni tamen pro deca respekto prisilentos iliajn nomojn au parencecon, kaj same pri lokoj, nur indikante Teritoriojn gheneralmaniere. Kaj neniu diros tion malperfekteco de Rakonto kaj misformeco de chi-mia kruda Akushajho, krom se tia Kritikanto estus tute malscia pri Filozofio: char se temi pri homoj pri ghi spertaj, ili ja vidos nenion manki al esenco de menciita Rakontado. Pro tio ke, estante afero evidenta kaj de

⁶ *lian rolon ludas*: la Milania guberniestro regas nome de la Hispana reĝo.

⁷ *Argo kaj Briareo*: helenaj mitologiaj monstroj: la unua provizita per cent okuloj, la dua per cent brakoj.

⁸ *Parcoj*: helen-romiaj mitologiaj diinoj de la homaj destino kaj morto.

neniu neata, ke nomoj estas nur nuraj akcidentoj...».

– Sed, post kiam mi estos elteninta la heroecan penadon transskribi ĉi tiun historion el tiu ĉi paliĝinta kaj skrapetita manskribaĵo, kaj mi estos laŭdire ĝin akuŝinta, ĉu poste troviĝos iu, kiu eltenos la penadon ĝin tralegi? –

Tiu ĉi dubo, estiĝinta dum klopodo deĉifri skrib-fuŝaĵon, kiu venis post *akcidentoj*, igis min interrompi la kopiadon, kaj pli serioze pripensi, kion do konvenas fari. – Estas ja vere, mi diris al mi mem, foliumante la manuskripton, estas ja vere, ke tia ĉi hajlado de sentencetoj kaj retorikaj figuroj ne daŭras tiel abunde tra la tuta verko. La bona deksep-jarcenta barokisto volis ĉe l' komenco elmontri sian bravuron; sed poste, ĉe la rakontado, kaj foje dum longaj fragmentoj, la stilo fluas pli nature kaj simple. Jes; sed kiel ĝi estas banala! kiel krudaĉa! kiel malkorekta! da Lombardaj idiotismoj⁹ abunde, nacilingvaj dirmanieroj uzitaj neoportune, arbitreca gramatiko, plumpaj periodoj. Kaj krome, kelke da hispaneskaj elegantaĵoj ie kaj tie; kaj krome, afero eĉ pli aĉa, ĉe la punktoj plej teruraj aŭ plej kompatindaj de la historio, ĉe ĉia okazo por mirigi aŭ pensigi, entute ĉe ĉiuj fragmentoj, kiuj ja postulas iom da retoriko, sed retoriko diskreta, fajna, bongusta, li neniam malhavigas tiun tian de la antaŭparolo. Kaj tiam, aĉe kunigante kun mirinda lerteco la plej opoziciajn ecojn, li sukcesas esti samtempe kruda kaj afekta, en la sama paĝo, en la sama periodo, en la sama vorto. Jen ĉi tie: bombastaj deklamoj kunmetitaj per aro da plataj solecismoj,¹⁰ kaj ĉie tiu ambicia plumpeco, kiu karakterizas la beletraĵojn de tiu jarcento, en tiu ĉi lando. Ververe, ne estas afero por prezenti al

⁹ *idiotismoj*: specialaj dirmanieroj, sen similaĵoj en aliaj lingvoj.

¹⁰ *solecismo*: kontraŭregulaj frazkonstruoj.

la legantoj de nia epoko: ili estas nun tro malnaivaj, tro naŭzitaj de tiaj ekstravagancoj. Bonŝance ke ĉi bonan personon mi ekhavis ĉe la komenco de ĉi tiu damnita laboro: kaj mi tute rezignas ĝin. –

Sed, dum mi fermis la paperaĉon, por ĝin formeti, mi sentis bedaŭron, ke tia bela historio devos resti nekonata; ĉar kiel historio, povas esti ke la leganto opinias alie, sed al mi mem ĝi ŝajnis bela, kiel mi diras; tre bela. – Kial ne eblus, mi pensis, elpreni la serion de la eventoj de ĉi tiu manuskripto, kaj refari ties dirmanieron? – Ĉar neniu serioza kontraŭdiro prezentiĝis, tiu solvo tuj estis decidita. Jen la origino de ĉi tiu libro, prezentita kun naiveco egala al la graveco de la libro mem.

Tamen kelke el tiuj eventoj, certaj moroj priskribitaj de nia aŭtoro, ŝajnis al ni tiel nekutimaj, tiel strangaj, por ne diri pli aĉe, ke, antaŭ ol ilin kredi, ni volis demand-esplori aliajn atestantojn; kaj ni komencis traserĉi la memoraĵojn de tiu epoko, por al ni klarigi, ĉu vere la mondo tiutempe iradis en tia maniero. Tiu esploro forigis ĉiujn niajn dubojn: ĉiupaŝe ni trafis en aferojn similajn, kaj eĉ pli drastajn: kaj, afero kiu ŝajnis al ni plej decida: ni trovis eĉ rolulojn, pri kies vera ekzisto ni dubis, ĉar ni neniam pri ili sciiĝis krom el nia manuskripto. Kaj, ĉe-okaze, ni citos kelkajn el tiuj atestoj, por havigi fidon al aferoj, kiujn, pro ilia strangeco, la leganto estus plej tentata malkredi.

Sed, se rifuzi kiel neelteneblan la dirmanieron de nia aŭtoro, per kia ni ĝin anstataŭigis? Jen la punkto.

Kiu ajn, ne petite, sin trudas por refari alies verkon, tiu sin elmetas al rigora juĝo pri la sia, kaj li iel sin devigas al tio: ĝi estas fakta kaj jura regulo, el kiu ni tute ne pretendas eskapi.

Por volonte submetiĝi al ĝi, ni eĉ intencis detale pravigi la stilon de ni uzitan; kaj ĉi-cele ni ade klopodis, dum nia tuta laboro, diveni la eventualajn kaj eblajn kritikojn, kun la intenco rebati ĉiujn anticipe. Kaj ne en tio estus la malfacilo; ĉar (tion ni diru omaĝe al la vero) nenia kritiko prezentiĝis en nia menso, sen akompano de triumfa respondo, el tiaj, kiuj, mi ne diras ke la demandojn solvas, sed ŝanĝas. Ofte, kontraŭmetante du kritikojn, ni igis ke unu disbatu la alian; aŭ, ilin esplorante ĝisfunde, kaj atente komparante, ni sukcesis malkovri kaj pruvi ke, tiel opoziciaj laŭŝajne, ili tamen estas samspecaj, ambaŭ naskite el preteratento de faktoj kaj principoj, sur kiuj la juĝo devas baziĝi; kaj, kun ilia granda surprizo, ni forsalutis ambaŭ kune. Tute ne troveblus alia aŭtoro, kiu same evidente sian pravecon pravas. Sed kio? kunmetonte ĉiujn menciitajn kontraŭdirojn kaj respondojn, por ilin iel ordigi, kompaton! ili konsistigus tutan libron. Ĉe tia konstato, ni preterlasis tiun intencon, pro du kialoj, kiujn la leganto certe trovos pravaj: unue, ke unu libro por pravigi alian, eĉ la stilon de la alia, aspektus afero ridinda; due, ke da libroj po unu sufiĉas, kiam eĉ ne superfluas.

I

Tiu branĉo de la lago de Como, kiu estas turnita al sudo, inter du seninterrompaj monto-ĉenoj, tute sinua kaj golfa laŭ la elstaro aŭ valiĝo de ĉi-lastaj, preskaŭ abrupte stretiĝas kaj akiras fluon kaj aspekton de rivero, inter promontoro dekstre kaj vasta plaĝo aliflanke; kaj la ponto, tie kunliganta la du bordojn, ŝajnas perceptigi eĉ pli klare al la okulo tiun ŝanĝon, kaj marki la punkton, kie la lago ĉesas kaj rivero Adda rekomenciĝas, por nomiĝi denove lago tie, kie la bordoj, denove distancaj, la akvon etendas kaj kvietigas en denovaj golfoj kaj sinuoj. La plaĝo, formita per la aluvioj¹ de tri grandaj torentoj, deklivas sur du intertuŝaj montoj: la unua nomata San Martino, la dua, per Lombarda dirmaniero, *Resegone*², pro ties multaj sinsekvaj pintoj, kiuj vere similigas ĝin al segilo, tiel ke neniu estas kiu, unuavide, kondiĉe ke li staras fronte, ekzemple el sur la nordaj muregoj de Milano, el tia karakterizo ne tuj distingas ĝin, en tiu longa kaj vasta altaĵaro, elinter ceteraj montoj kun nomoj malpli konataj kaj formoj pli ordinaraj. La bordo-deklivo longe alsupras nekruta kaj kontinua; poste ĝi abruptas je elstaraĵoj kaj valetoj, krutaĵoj kaj plataĵoj, laŭ la strukturo de la du montoj kaj la erozio³ de la akvoj. La monto-bazo, sulkita de la elfluejoj de l' torentoj, konsistas preskaŭ tute el gruzo kaj ŝtonoj; la resto, el kampoj kaj vitejoj, kun sporadaj domaroj, vilaĝoj kaj kampar-domoj; ie arbaroj, kiuj pluetendiĝas surmonten. Lecco, kiu estas la ĉefa el tiuj lokoj, kaj donas nomon al la tuta teritorio, kuŝas ne tre distance de la ponto, ĉe l' bordo de la lago, ĝi eĉ

¹ *aluvioj*: tavoloj da tero kaj gruzo alportitaj de akvo-fluo.

² *Resegone* signifas 'Segilo'.

³ *erozio*: sulkigo kaŭzita de fluanta akvo.

troviĝas parte en la lago mem, kiam ĉi tiu elbordiĝas inunde: nuntempe ĝi estas urbeto, survoje fariĝi urbo. En la epoko, kiam okazis la eventoj, kiujn ni entreprenas rakonti, tiu vilaĝego, jam konsiderinda, estis ankaŭ kastelhava, kaj tial ĝi havis la honoron gastigi komandanton, kaj la avantaĝon⁴ posedi konstantan garnizonon el hispanaj soldatoj, kiuj instruis ĉastecon al la lokaj knabinoj kaj virinoj, kaj karesis de tempo al tempo la dorson de kelkaj edzoj, de kelkaj patroj; krome, ĉe la somerfino, neniam ili neglektis disiri tra l' vitejoj, por maldensigi la vinberojn, kaj per tio mildigi al la kamparanoj la penojn de vinber-rikolto. De unu al alia el tiuj lokoj, de la altaĵoj al la lago-bordo, de unu elstaraĵo al alia, iris, kaj ankoraŭ iras, vojetoj kaj padoj, pli-malpli krutaj aŭ ebenaj, foje profundaj, kaŝitaj inter du muroj, de kie suprenrigardante, vi povas malkovri nur pecon de ĉielo kaj kelke da monto-pintoj: alifoje levitaj, sur apertaj talusoj: kaj de ĉi tie la rigardo etendiĝas tra perspektivoj pli-malpli ampleksaj, sed ĉiuokaze riĉaj kaj iel novaj, laŭ tio, kion la diversaj vidpunktoj pli-malpli montras el la vasta ĉirkaŭ-sceno, aŭ ke tiu aŭ alia parto laŭvice plenkampas aŭ profiliĝas, aperas aŭ malaperas. Iuloke unu fragmento, aliloke alia, alie longa spaco de tiu vasta kaj varia akvo-spegulo. Ĉi-flanke: lago, fermita aŭ pli ĝuste forkonfuzita en aro, en zigzago de montoj, kaj laŭvice pli vasta inter aliaj montoj, kiuj unu post alia malfermiĝas al la rigardo, kaj kiujn la akvo reflektas renversitaj, kun la vilaĝetoj staraj sur la bordoj. Transe: branĉo de rivero, poste lago, poste denove rivero, kiu forperdiĝas en brileta serpentumo plu inter la montoj, kiuj ĝin akompanas, laŭgrade malaltiĝas kaj ankaŭ

⁴ *honoron... avantaĝon*: Manzoni aludas ironie la perfortaĵojn kaj ĉikanojn de la hispana okupacio.

ili mem preskaŭ svenas ĉe l' horizonto. La loko mem, de kie vi kontemplas tiujn variajn spektaklojn, estas al vi ĉiuflanke spektakla: la monto, sur kies deklivo vi promenas, al vi disvolvas supre kaj ĉirkaŭe siajn pintojn kaj krutojn, distingajn, reliefajn, diversajn preskaŭ ĉiupaŝe, ĉar tio, kio al vi ŝajnis unu sola altaĵo, malfermiĝas kaj akiras konturojn de altaĵaro, kaj tio, kio ĵus prezentiĝis flanke, nun aperas surpinte: kaj la plaĉa kaj familiara aspekto de ĉi tiuj deklivoj agrable moderigas la sovaĝon kaj plibeligas la grandiozon de l' aliaj vidaĵoj.

Tra unu el tiuj vojetoj rehejmeniĝis tut-trankvile el promeno, ĉe l' vespero de l' tago 7-a de novembro de la jaro 1628-a, Don Abbondio, parokestro de unu el la vilaĝoj supre menciitaj: nek la nomo de tiu loko, nek la famili-nomo de la persono troviĝas en la manuskripto, nek ĉi tie, nek aliloke. Li estis leganta trankvile sian brevieron, kaj foj-foje, inter unu psalmo kaj alia, li fermis la libron, entenante kiel paĝ-indikilon la montran fingron de la dekstra mano, li metis ĉi-lastan en la alian malantaŭ la dorso, li plu marŝis, rigardante teren, kaj per piedo li ŝovis al la muro la ŝtonetojn stumbligajn surpade. Poste li levis la vizaĝon, ĉirkaŭturnis malvigle la okulojn, kaj fiks-rigardis la monto-parton, kie la lumo de la jam malaperinta suno, eskape el la kontraŭaj intermontoj, ie kaj tie pentriĝis sur la elstaraj rokoj, kvazaŭ per larĝaj misegalaj purpuraj drapaĵoj. Pli poste li malfermis denove la brevieron, kaj recitis alian fragmenton, ĝis li atingis pado-kurbon, kie ĉiufoje li kutimis levi la okulojn el la libro, kaj rigardi antaŭen: kaj tiel li faris ankaŭ tiun tagon. Post la kurbo, la vojo iris rekte eble sesdek paŝojn, kaj poste dividiĝis ipsilone en du vojetojn: la dekstra alsupris monten, kaj

kondukis al la pastrejo; la alia desupris valen, ĝis torento; kaj ĉi-flanke la muro altis nur ĝis la kokso de pasanto. La internaj muroj de l' du vojetoj, anstataŭ kuniĝi angule, finiĝis per speco de sankta steleo⁵, sur kiu estis pentritaj longaj, serpentumaj, pintaj figuroj, kiuj laŭ la intenco de la pentristo kaj la imago de la najbaraj loĝantoj, signifis flamojn, kaj, alterne kun ĉi-lastaj, aliaj figuroj, ne priskribeblaj, kiuj signifis purgatoriajn animojn: animoj kaj flamoj brik-ruĝaj, sur grizaĉa fono, ie kaj tie sen-stuka. La pastro, post kiam li sin turnis laŭ la voj-kurbo kaj direktis laŭkutime la okulojn al la steleo, ekvidis aferon, kiun li nek atendis, nek volus vidi. Du viroj, unu fronte al alia, troviĝis ĉe la kunfluejo, se tiel diri, de la du vojetoj: unu el ili sidis rajde sur la malalta mureto, kun unu kruro pendanta eksteren kaj la alia piedo metita sur la vojo-grundo; la kompano staris apogite al la muro, kun la brakoj krucitaj surbruste. La vesto, la sinteno, kaj tio, kio el la loko atingita de la pastro distingeblis je ilia aspekto, ne ebligis dubon pri ilia profesio. Ambaŭ havis ĉirkaŭ la kapo verdan reton, kiu falis al la maldekstra ŝultro kaj finiĝis per granda kvasto,⁶ kaj el la reto eliris surfrunten enorma hartufo; du longaj lipharoj pinte torditaj; polurita leda zono, kaj du pistoloj al ĝi kroĉitaj; malgranda korno, plena de pulvo, penda surbruste, kvazaŭ koliero; tenilo de tranĉilaĉo elstara el poŝo de la vasta kaj ŝvela pantalono; glavego kun granda manprotektilo el traboritaj latunaj lamenoj, kombinitaj kvazaŭ ĉifre, poluritaj kaj brilaj: unuavide ili evidentiĝis kiel individuoj el la specio de l' *bravuloj*.

Tiu ĉi specio, nun tute pereinta, tiuepoke prosperegis en

⁵ *steleo*: sur-desegnita pilastro.

⁶ *kvasto*: speco de ornama bulo aŭ peniko el kunaĵo de fadenoj.

Lombardujo, kaj jam estis tre antikva. Se iu havus nenian scion pri ĝi, jen kelke da aŭtentikaj fragmentoj, kiuj povos doni sufiĉan skizon pri ĝiaj precipaj ecoj, pri la klopodoj faritaj por ĝin estingi, kaj pri ĝia persista kaj prospera vivo.

Jam ek de la oka de aprilo de la jaro 1583-a, la tre Eminentaj kaj Ekscelentaj senjoroj Don Carlo de Aragono, Princo de Castelvetrano, Duko de Terranuova, Markizo de Avola, Grafo de Burgeto, granda Admiralo kaj granda Konestablo de Sicilio, Guberniestro de Milano kaj Kapitano-Generalo de Lia Katolika Reĝa Moŝto en Italujo, *plene informite super ne-tolerebla mizero, en kiu vivis kaj vivas tiu ĉi Urbo Milano, kaŭze de bravuloj kaj vagabondoj, publikigas kontraŭ ili ekzil-ordonon. Li deklaras kaj difinas kiel inkluzivitajn en ĉi tiu ekzil-ordono, kaj taksendajn kiel bravulojn kaj vagabondojn... ĉiujn, fremdulojn aŭ landanojn, kiuj nenian profesion havas, aŭ havante ne praktikas... sed, sen salajro aŭ kun ĝi, sin apogas al kavaliro aŭ nobelo, al oficisto aŭ komercisto... por al ili fari ŝultro-protektion kaj favoron, aŭ eĉ, kiel suspektindas, por insidon fari kontraŭ aliuloj... Al ĉi-ĉiuj li ordonas, ke limtempe de tagoj ses, ili forlasu la landon, al malobeontoj li minacas galer-punon, kaj li havigas al ĉiuj justic-funkciuloj la plej strange vastajn kaj senlimajn rajtojn por plenumi la ordonon. Sed en la sekva jaro, la 12-an de aprilo, la menciita senjoro, rimarkante, ke tiu ĉi Urbo plu estas plena de menciitaj bravuloj... denove vivantaj kiel ili vivis antaŭe, tute ne shanghinte moron sian, nek malpliiginte nombron, eligas alian kriaĵon, eĉ pli drastan kaj rimarkindan, en kiu inter aliaj ordonoj li preskribas:*

Ke ĉiu ajn persono, tiel de tiu ĉi Urbo kiel fremda, kiu per du atestantoj konstatighos esti opiniata kaj ĝenerale

taksata kiel bravulo, kaj tiun nomon havi, ech se ne pruvighus, ke li ian krimon faris... nur pro chi tiu reputacio de bravulo, sen aliaj indicoj, tiun rajtu menciitaj jughistoj, kaj chiu el ili, elmeti al shnurego kaj torturo, por esplora proceso... kaj ech se li nenian krimon konfesus, oni lin tamen forsendu al galero, por menciita trijara puno, pro nura opinio kaj renomo de bravulo, kiel supre. Ĉi-ĉio, kaj la pluo, kiun ni preterlasas, ĉar Lia Ekscelenco rezolutas esti obeata de chiu.

Ĉe aŭdo de tiel drastaj kaj firmaj vortoj de tia senjoro, kun akompano de tiaj sankcioj, oni tute emus kredi, ke ĉe l' nura sonoro de ili, malaperis ĉiuj bravuloj por ĉiam. Sed atesto de senjoro ne malpli aŭtoritata, nek malpli garnita per titoloj, nin devigas kredi la tutan malon. Temas pri la tre Eminentaj kaj Ekscelentaj Juan Fernandez de Velasco, Konestablo de Kastilio, Ĉefkameristo de Lia Majesto, Duko de Urbo Frias, Grafo de Haro kaj Castelnuovo, Senjoro de la Domo de Velasco kaj de tiu de la Sep Infantoj de Lara, Guberniestro de Milano-Ŝtato, k.c. La 5-an de junio de la jaro 1593-a, ankaŭ li mem plene informite, *kiajn damaghon kaj ruinojn kauzas... bravuloj kaj vagabondoj, kaj kian achegan malbonon tia speco de homoj faras kontraŭ publikan bonon, kaj spite al justico, al ili denove ordonegas, ke limtempe de tagoj ses, ili malobstrukcu la landon, ripetante preskaŭ samajn preskribojn kaj minacojn de sia antaŭulo. Pli poste, la 23-an de majo de la jaro 1598-a, informite, kun ne malgranda chagreno de sia animo, ke... chiutage pli kaj pli en tiu chi Urbo kaj Shtato kreskadas nombro de chi tiaj uloj (bravuloj kaj vagabondoj), kaj nenio pri ili tage kaj nokte audighas, krom vundoj embuske faritaj, murdoj kaj raboj, kaj chia cetera speco de krimoj, al kiuj menciitaj bravuloj pli kaj pli inklinas,*

konfidante ricevi helpon de siaj chefoj kaj protektantoj,... li denove preskribas la samajn rimedojn, kaj pliigis la dozojn, kiel oni kutimas ĉe obstinaj malsanoj. Chiu do, li konkludas, tutece sin gardu kontraŭtari iaparte chi tiun kriaĵhon, char, anstataŭ sperti indulgemecon de Lia Ekscelenco, tiu spertos rigorecon kaj koleron lian... ĉar Lia Ekscelenco estas rezoluta kaj firm-decida, ke chi tiu estu lia lasta kaj definitiva admono.

Ne samon tamen opiniis la tre Eminentaj kaj Ekscelenca Moŝto, Senjoro Don Pietro Enriquez de Acevedo, Grafo de Fuentes, Kapitano, kaj Guberniestro de Ŝtato Milano; li ne samopiniis, kaj tute prave. *Plene informite pri mizero, en kiu vivadas tiu chi Urbo kaj Shtato kauze de granda nombro de bravuloj, kiu en ghi abundas... kaj rezoluta tute elradikigi tian ruinigan semon, li eligas, la 5-an de decembro 1600, novan kriaĵon, same plenan de severegaj sankcioj, kun firma intenco, ke ili tute estu plenumotaj, kun chia rigoro, kaj sen espero de indulgo.*

Estas tamen kredinde, ke al tio li ne sin devigis kun tia volonteco, kian li kapablis apliki, por teksti intrigojn, kaj estigi malamikojn al sia malamikego Henriko la 4-a; ĉar, ĉi-teme, la historio atestas, kiel li sukcesis armi kontraŭ tiu reĝo la dukon de Savojo, al kiu li perdigis pli ol unu urbo; kiel li sukcesis komplotigi la dukon de Biron, al kiu li perdigis la kapon; sed koncerne la tiom ruinigan semon de l' bravuloj, certas ke ĝi plu prosperis la 22-an de septembro de la jaro 1612. En tiu tago la tre Eminentaj kaj Ekscelenca Moŝto, Senjoro Don Giovanni de Mendoza, Markizo de la Hynojosa, Nobelo kc. Guberniestro kc., serioze decidis elradikigi ĝin. Ĉi-cele, li sendis al Pandolfo kaj Marco Tullio Malatesti, reĝaj ĉambraj presistoj, la kutiman kriaĵon, korektitan kaj pliigitan, por ĝin

presigi por ekstermo de l' bravuloj. Sed ĉi-lastaj plu vivis, por ricevi, la 24-an de decembro de la jaro 1618, egalajn kaj eĉ pli drastajn batojn de la tre Eminentaj kaj Ekscelencaj Moŝtoj, Senjoroj Don Gomez Suarez de Figueroa, Duko de Feria, kc. Guberniestro kc. Sed, ĉar ne eĉ de tiuj batoj ili mortis, la tre Eminentaj kaj Ekscelencaj Moŝtoj, Senjoroj Gonzalo Fernandez de Cordova, dum kies regado okazis la promeno de Don Abbondio, troviĝis devigita rekorekti kaj republikigi la kutiman kriaĵon kontraŭ la bravuloj, en la tago 5-a de oktobro de la 1627-a jaro, tio estas unu jaron, unu monaton kaj du tagojn antaŭ tiu memorinda evento.

Kaj ne temis pri la lasta publikigo; sed ni ne taksas nin devigitaj mencii la pli postajn, ĉar ili ne koncernas la tempolimon de nia historio. Ni menciotos nur unu, datitan je la 13-a de februaro de la jaro 1632, en kiu la tre Eminentaj kaj Ekscelencaj Senjoroj, *el Duque de Feria*, duan fojon guberniestro, nin avertas, ke *plej grandaj krimajhoj devenas de tiel nomataj bravuloj*. Tio ĉi sufiĉas por nin certigi, ke, en la tempo, pri kiu ni traktas, da bravuloj plu estis.

Ke la priskribita duopo atendas homon, estis afero eĉ tro evidenta; sed tio, kio pleje ĉagrenis Don Abbondion, estis la ne-dubinda konstato, el iuj gestoj, ke la atendato estas li mem. Fakte, ĉe lia apero, ili ekrigardis unu la alian vizaĝen, levante la kapon per movo, el kiu vidiĝis, ke ambaŭ samtempe diris: estas li mem; la rajde sidanta tiris la kruron sur la vojon kaj leviĝis; la alia disiĝis de la muro; kaj ambaŭ ekiris al li renkonte. Li, plu tenante antaŭ si la brevieron malfermita, kvazaŭ li legus, levis la rigardon, por gvati la movojn de la duopo. Vidante, ke ili venas ĝuste al li mem, li estis atakita de mil pensoj. Li urĝe demandis sin ĉu, inter la bravuloj kaj li,

troviĝas elirejo, dekstre aŭ maldekstre; kaj li tuj memoris, ke ne. Li faris rapidan mem-ekzamenon, ĉu li pekis kontraŭ potenculo, kontraŭ venĝemulo; sed, eĉ en tia perturbo, la konsola atesto de l' konscienco lin sufiĉe sekurigis: la bravuloj tamen plu proksimiĝis, fiksrigardante lin. Li metis la montran kaj la longan fingrojn de la maldekstra mano en la kolumon, kvazaŭ por ĝustigi ĝin; li ŝovis la du fingrojn ĉirkaŭ la kolo, dum li turnis dorsen la vizaĝon, tordante samtempe la buŝon, kaj flank-okule rigardis ĝis-pove, por vidi, ĉu iu alvenas; sed neniu li vidis. Li ekrigardis super la mureto, en la kampojn: neniu; li turnis alian pli modestan rigardon al la fronta vojo: neniu, krom la bravuloj. Kion fari? ĉu retroiri: li ne havis tempon; ĉu forkuri: estus same kiel diri: persekutu min, aŭ eĉ pli aĉe. Ĉar li ne povis eviti la danĝeron, li ekkuris al ĝi, ĉar la momentoj de tia necerteco estis al li tiel turmentaj, ke li nenion deziris, krom ilin mallongigi. Li rapidigis la paŝadon, recitis unu preĝo-verseton pli laŭte, mienigis la vizaĝon kiel eble plej kvieta kaj gaja, tute klopodis prepari rideton; kiam li troviĝis fronte al la du honestuloj, li diris en si mem: jen ni ĉi tie; kaj tie li ekhaltis.

«Sinjoro parokestro», diris unu el la duopo, rigardegante lian vizaĝon.

«Kion vi ordonas?» tuj respondis Don Abbondio, levante sian rigardon el la libro, kiu restis tute malfermita en liaj manoj, kvazaŭ sur pupitro.⁷

«Vi havas intencon», daŭrigis la alia, kun minaca kaj kolera maniero kvazaŭ de l' homo, kiu surprizas subulon faronta friponaĵon, «vi havas intencon geedzigi morgaŭ Renzon Tramaglino kun Lucia Mondella!».

⁷ *pupitro*: libr-ingo: mebleto, por subteni malfermitan libron.

«Tio estas...» respondis Don Abbondio kun tremetanta voĉo: «tio estas. Viaj moŝtoj estas mondumaj homoj, kaj tute scias, kiel iras aferoj tiaj. La kompatinda pastro tute ne kulpas: ili kombinas sian kaĉon inter si, kaj poste... kaj poste ili venas al ni, kiel oni irus al banko por enkasigi: kaj ni... ni estas la servistoj de l' komunajho».

«Nu bone», al li diris la bravulo ĉe-orele, sed kun solena ordon-tono, «ĉi tiu geedziĝo tute ne estas por fari, nek morgaŭ nek iam ajn».

«Sed miaj sinjoroj», replikis Don Abbondio kun la milda kaj ĝentila voĉtono de l' homo, kiu volus persvadi senpacienculon, «sed miaj sinjoroj, degnu imagi vin en mia situacio. Se la afero dependus de mi,... vi ja vidas, ke al mi nenio venas enpoŝen...».

«Nu», interrompis la bravulo, «se la afero decidiĝus per babiloj, vi metus nin en sen-eskapejon. Ni nek scias, nek scii volas pli multe. Avertu homon savas...⁸ vi nin komprenas.»

«Sed viaj moŝtoj estas tro justaj, tro pravaj...».

«Sed», interrompis ĉi-foje la alia kompano, ĝis tiam silentinta, «sed la geedziĝo tute ne estas por fari, aŭ...» kaj ĉi tie li eldiris trafan blasfemaĉon, «aŭ kiu ĝin faros, tiu ne pentos, ĉar tempon li ne havos, kaj...» alian blasfemaĉon.

«Silentu, silentu», reparolis la unua oratoro, «la respektinda parokestro estas homo, kiu konas la mondan vivon; kaj ni estas honestuloj, kiuj al li ne intencas malbonfari, kondiĉe ke li prudentu. Sinjoro parokestro, la eminentega senjoro Don Rodrigo, nia mastro, vin riverencas amoplene».

Tiu ĉi nomo estis, en la menso de Don Abbondio, kvazaŭ

⁸ Aludo al proverbo: «Avertu homon savas, se li prudenton havas».

fulmo, kiu kulmine de nokta ŝtormo, momente kaj konfuzo lumigas la objektojn, kaj pliigas la teruron. Li faris, kvazaŭ instinkte, profundan kliniĝon, kaj diris: «Se viaj moŝtoj scipovus al mi sugesti...»

«Ho! ĉu sugesti al vi, kiu kompetentas pri Latino!» interrompis ankoraŭ la bravulo, kun ridaĉo inter maldeca kaj kruela. «Afero via. Kaj super ĉio, eĉ ne unu vorton vi ellasu pri tiu ĉi averto, kiun por via bono ni al vi faris; se ne... hm... estus same kiel fari tiun-tian geedzigon. Nu, kion vi deziras, ke ni diru vianome al la eminentega senjoro Don Rodrigo?»

«Mian respekton...».

«Klarigu pli bone!».

«... Dispona... daŭre dispona al obeo». Kaj, dum li diris tiujn ĉi vortojn, li mem ne sciis, ĉu li faras promeson aŭ komplimenton. La bravuloj ilin taksis, aŭ ŝajnis ilin taksi, laŭ ties plej serioza senco.

«Bonege, kaj bonan nokton, respektinda», diris unu el ili, forirante kun la kompano. Don Abbondio, kiu antaŭ kelke da momentoj oferis eĉ okulon por ilin eviti, tiam volus daŭrigi konversacion kaj intertrakton. «Sinjoroj...» li komencis, fermante la libron per la du manoj; sed ili, ne plu aŭskultante, ekiris la vojon de kie estis li veninta, kaj ili foriris, kantante fikanzonon, kiun mi ne volas transskribi. La kompatinda Don Abbondio restis momente gapa, kvazaŭ sorĉita; poste, el la du vojetoj, li eniris la kondukantan al lia hejmo, pene trenante la krurojn, kiuj ŝajnis kramfaj.⁹ Lian animstaton oni pli bone komprenos, post kiam ni iom diros pri lia temperamento, kaj pri la epoko, en kiu al li sortis vivi.

Don Abbondio (la leganto tion jam rimarkis) ne estis

⁹ *kramfaj*: rigidiĝintaj.

naskita kun leona koro. Sed ek de l' unuaj vivo-jaroj li devis kompreni, ke tiuepoke plej aĉa kondiĉo estas tiu de besto sen ungegoj nek dentegoj, kiu tamen ne inklinas esti vorata. La leĝaj fortoj tute ne protektis la homon kvietan, neofendan, sen rimedoj por timigi. Verdire tute ne mankis leĝoj kaj sankcioj kontraŭ privataj perfortoj. Leĝoj eĉ tro abundis; la krimoj estis elnombritaj kaj detalitaj kun malkonciza pedanteco; la punoj, freneze ekscesaj, kaj, se ne sufiĉe, pliigeblaj, preskaŭ ĉiukaze, laŭ arbitro de la leĝodonanto kaj de aro da plenumantoj; la proceduroj nur celantaj liberigi la juĝiston el ĉio, kio povus malhelpi kondamnan verdikton: la fragmentoj, de ni cititaj, el la kriaĵoj kontraŭ la bravuloj, estas eta, sed fidela specimeno de tio. Malgraŭ tio, eĉ grandparte ĝuste pro tio, tiuj kriaĵoj, reeldonataj kaj pli-fortigataj de registaro al registaro, nenion efikis krom bombaste atesti la senpovecon de siaj aŭtoroj; aŭ, se ian senperan efikon ili havis, ĝi konsistis en tio, ke ili plimultigis ĉikanojn kontraŭ kvietaj kaj senfortaj homoj fare de supertruduloj, kaj pliigis la perfortojn kaj ruzaĵojn de ĉi-lastaj. La senpuneco estis organizita, kaj havis radikojn, kiujn la kriaĵoj ne tuŝis, aŭ ne ŝancelis. Tiaj estis la aziloj, tiaj la privilegioj de iuj klasoj, parte agnoskataj de la leĝoj, parte tolerataj kun rankora silento, aŭ kontestataj per vanaj protestoj, sed fakte subtenataj kaj defendataj de tiuj klasoj kun profitema aktiveco kaj puntilia ĵaluzo. Nu, tiu senpuneco, minacate kaj insultate, sed ne detruate per la kriaĵoj, ĉe ĉiu minaco, ĉe ĉiu insulto, kompreneble devis apliki novajn klopodojn kaj novajn eltrovojn, por konservi sin. Tiel efektive okazis; kaj, ĉe l' apero de la kriaĵoj celantaj bremsi la perfortulojn, ĉi lastaj serĉis en sia fakta forto novajn pli oportunajn rimedojn, por gardi tion, kion la kriaĵoj intencis

malpermesi. Tiuj kriaĵoj ja povis ĉiupaŝe stumbligi la simplulon sen propra forto kaj protekto; ĉar, por kontroli ĉian homon kaj preventi aŭ puni ĉian krimon, ili submetis ĉiun movon de privatulo al la arbitro de ĉiuspecaj plenumantoj. Sed la homo kiu, antaŭ ol fari krimon, disponigis la aferojn por ĝustatempe rifuĝi en monakejon, en palacon, kien neniam ĝendarmoj aŭdacis enpaŝi; aŭ kiu, sen aliaj singardoj, surportis livreon, kiu devigos al lia defendo la vantecon kaj intereson de potenca familio, de tuta socia klaso, tiu estis libera en siaj operacioj, kaj povis primoki la tutan bruegon de tiuj kriaĵoj. Inter tiuj mem, kiuj havis la taskon ilin observigi, iuj apartenis pro naskiĝo al la privilegia klaso, aliaj dependis de ĝi pro klienteco; unuj kaj aliaj akceptis ties principojn pro edukiĝo, pro intereso, pro kutimo, pro imito; kaj ili tute ne intencis tiajn principojn ofendi pro amo al paper-peco afiŝita ĉe strat-anguloj. Aliflanke, la homoj komisiitaj por ilia aplikado, eĉ se ili estus aŭdacaĵoj kiel herooj, obeemaj kiel monakoj, sinoferaj kiel martiroj, ne povus tamen finsukcesi, pro tio ke ili estis tute malpli nombraj ol tiuj, kiujn ili devus subigi, kaj ĉar tre verŝajne ili estus forlasotaj de tiu mem, kiu abstrakte kaj teorie, ordonis ke ili agu. Krom tio, ĝenerale ili apartenis al la plej fiaj kaj krimemaj uloj de sia epoko; ilian oficon taksis senforta tiu mem, kiuj povus ĝin timegi, kaj ilia titolo estis taksata kiel insulto. Estis do kompreneble ke ili, anstataŭ riski, kaj eĉ oferi la vivon en malespera elpaŝo, vendis al la potenculoj sian neaktivecon aŭ eĉ sian koluzion, kaj rezervis la aplikon de sia malbenata aŭtoritato kaj de sia fakta forto al la tute sendanĝeraj kazoj; tio estas premante kaj turmentante kvietajn kaj sendefendajn homojn.

La homo, kiu intencas ofendi, aŭ kiu timas ofendiĝon,

kompreneble serĉas aliancanojn kaj komplikojn. Pro tio la unuopuloj plej multe emis tiuepoke teni sin kunligitaj laŭ klasoj, kaj havigi, ĉiu al la sia, plej grandan potencon. La pastraro viglis por gardi kaj plivastigi siajn imunecojn¹⁰, la nobelaro siajn privilegiojn, la armeanoj sian senimpostecon. La komercistoj, la metiistoj estis varbitaj laŭ gildoj¹¹ kaj frataroj, la juristoj formis ligojn, eĉ la kuracistoj korporacion. Ĉiu el tiuj etaj oligarkioj havis specialan, propran forton; en ĉiu el ili la individuo povis elprofiti por si mem, proporcie de sia prestiĝo kaj lerteco, la kunigitajn fortojn de multaj. La plej honestaj eluzis tiun avantaĝon nur memdefende; la ruzaj kaj krimemaj elprofitis ĝin por plenumi la kanajlaĵojn, por kiuj iliaj solaj fortoj ne sufiĉus, kaj por al si garantii senpunecon. Sed la fortoj de tiuj diversaj ligoj estis tre malegalaj; kaj, ĉefe en la kamparoj, la riĉa kaj perforta nobelo, ĉirkaŭita de aro da bravuloj, kaj de popolo el kampuloj kutimaj pro familia tradicio, kaj interesitaj aŭ devigitaj taksu sin kiel subulojn kaj soldatojn de la mastro, disponis potencon, kontraŭ kiu malfacile alia ligo-frakcio povus tie rezisti.

Nia Abbondio, ne nobela, ne riĉa, des malpli kuraĝa, rimarkis do, preskaŭ antaŭ ol atingi la aĝon de prudento, ke en tia socio li estas kvazaŭ argila poto devigata vojaĝi kune kun pluraj potoj el fero. Tre volonte do li obeis la gepatrojn, kiuj volis lin pastro. Verdire li ne profunde pripensis la devojn kaj noblajn celojn de la ofico, al kiu li sin dediĉos: havigi al si rimedojn, por vivi iom komforte, kaj sin loki en klason respektatan kaj potencon, ŝajnis al li du motivoj pli ol sufiĉaj por tia elekto. Sed ĉiu ajn klaso sekurigas kaj protektas

¹⁰ *imuneco*: privilegio liberiganta el leĝa devigo.

¹¹ *gildoj*: asocioj de samprofesiuloj, por reciproka helpo.

unuopulon nur parte: nenia klaso liberigas onin el la tasko starigi sian personan vivsistemon. Don Abbondio, daŭre zorgema por sia trankvilo, ne okupiĝis pri la avantaĝoj, kies akiro bezonus multe da klopodo aŭ iom da risko. Lia sistemo ĉefe konsistis en evito de ĉiuj kontraŭstaroj, kaj cedo al tiuj, kiujn li eviti ne povis. Nearmita neŭtraleco en ĉiuj militoj, kiuj eksplodis ĉirkaŭ li, ek de la konfliktoj, tiam ofteĝaj, inter pastraro kaj laikaj potencoj, inter armeano kaj civilulo, inter nobeloj kaj nobeloj, ĝis la kvereloj inter du kampuloj, kaŭzitaj de unu vorto kaj deciditaj per pugnoj aŭ tranĉil-frapoj. Se li nepre devis partianiĝi inter du konfliktantoj, li aniĝis al la pli fortika, ĉiam tamen ariergarde, kaj strebante montri al la alia, ke ne volonte li estas al li malamika: kvazaŭ li dirus: kial do vi ne kapablis esti pli fortika? mi partianus al vi. Sin tenante for de perfortuloj, malŝajnigante iliajn momentajn kapricajn trudojn, respondante per obeemo al la pli gravaj kaj pli intencaj perfortoj, devigante, per multe da riverencoj kaj gajmienaj respekt-esprimoj, eĉ la plej morozajn kaj fierajn senjorojn fari al li rideton, kiam li renkontis ilin surstrate, la povrulo sukcesis preterpasi sesdek vivo-jarojn, sen gravaj ŝtormoj.

Tamen eĉ li mem ne malhavis iom da galo¹² enkorpe; kaj tiu daŭra paciencado, tiu ofteĝa pravigo de aliuloj, tiom da maldolĉaj buŝplenoj glutitaj silente, tiagrade ekscitegis tiun galon, ke se li ne povus de tempo al tempo iomete ĝin ellasi, lia farto el tio certe suferus. Sed, ĉar finfine en la mondo, kaj eĉ tre proksime al li, estis homoj, kiujn li tute konis kiel nekapablajn malbonfari, kun ili do li povis foje ellasi la mis-

¹² *galo*: hepata maldolĉa sekreciaĵo; figurasence: akrega malbonhumoro.

humoron longe retenatan, kaj fine kontentigi la emon iom kaprici, kaj kriaĉi malprave. Rilate homojn, kiuj ne kondukis kiel li, li estis rigora cenzuranto, kiam tamen la cenzuro¹³ povus okazi sen ajna, eĉ plej fora danĝero. La venkito estis, minimume, homo ne singarda; la murdito ĉiam estintis agitemulo. Kiam iu homo provis defendi sian pravon kontraŭ potenculo, kaj restis kun rompita kapo, Don Abbondio ĉiam trovis en li iom da malpravo; afero ne malfacila, ĉar pravo kaj malpravo neniam distranĉiĝas tiel nete, ke ĉiu partio havu nur el unu aŭ el alia. Super ĉio li deklamadis kontraŭ tiuj kunpastroj, kiuj siariske pledis por premata senfortulo kontraŭ potenca perfortulo. Laŭ li, tio signifis aĉeti ĝenojn per kontmono, strebi rektigi hundajn gambojn; li diris ankaŭ, tre severe, ke ĝi estas enmiksiĝo en nereligiajn aferojn, kun damaĝo al la digno de la pastra ofico. Kaj kontraŭ tiaj uloj li predikis, nur tamen vizaĝ-al-vizaĝe, aŭ en tute eta rondo, des pli impete, ju pli konataj ili estis kiel tute ne ofendiĝemaj pri aferoj koncernantaj ilian personon. Kaj li havis plej ŝatatan sentencon, per kiu ĉiufoje li sigelis ĉi-temajn parolojn: ke la honestulo, kiu sin gardas, kaj prizorgas nur siajn aferojn, neniam trafas en malfeliĉajn renkontojn.

Nu imagu miaj dudek kvin legantoj, kiel tio, kion ni ĵus rakontis, impresis la animon de la povrulo. La teruro pro tiaj mienaĉoj kaj parolaĉoj; la minaco de senjoro konata kiel homo kiu ne vane minacas; lia trankvila vivsistemo, konstruita per longjara klopodado kaj paciencado, subite renversita; kaj la impliko, sen videbla elturniĝo: ĉiuj ĉi pensoj tumulte zumadis en la mallevita kapo de Don Abbondio. – Se Renzon eblus resendi pace per neta "ne", nu; sed li postulos pravigojn; kaj

¹³ *cenzuro*: morala kritiko.

kion mi havas por respondi, pro la ĉielo? Kaj, kaj, kaj... eĉ li mem havas tian karakteron: ŝafido, se neniu lin tuŝas, sed se oni volus lin kontraŭdiri... oj! Kaj krome, krome: tiel freneze pasia je tiu Lucia, enamiĝinta kiel... Bubaĉoj, kiuj, nesciante kion fari, enamiĝas, volas edziĝi, nenion alian pripensas; ne konsideras, kiajn zorgaĉojn ili kaŭzas al kompatinda honestulo. Ho ve al mi! Vidu, ĉu tiuj du ulaĉoj devus sin prezentaĉi ĝuste sur mia vojo kaj enmiksi min! Kio min koncernas? Ĉu mi mem volas edziĝi? Kial ili prefere ne iris paroli... Ho, nu vidu, kian destinaĉon mi havas: ke trafaj pensoj ĉiam venas en mian kapon unumomente post la oportuno. Se mi estus ekpensinta sugesti ke ili mem iru transdoni tiun mesaĝon... – Sed ĉe tio li ekkonsciis, ke pento pro tio, ke li ne estis konsilanto kaj kunlaboranto de malicaĵo, estas tro malica afero; kaj li turnis la tutan koleron de siaj pensoj kontraŭ tiun alian, kiu tiel perturbis lian kvieton. Li konis Don Rodrigon nur laŭvide kaj laŭfame, kaj neniam li havis kun li rilaton, krom tuŝi la bruston per la mentono, kaj la teron per la ĉapel-pinto, en la maloftaj fojoj, kiam li renkontis lin survoje. Pli ol unufoje li ĉe-okaze defendis la reputacion de tiu moŝtulo, kontraŭ tiuj, kiuj, mallaŭte, kun suspiroj kaj kun la okuloj levitaj al la ĉielo, malbenis iun el liaj misfaroj: li centfoje deklaris ke li estas respektinda kavaliro. Sed en tiu momento li en sia koro al li aplikis rapide, sen interrompo per unu "oj", ĉiu-specajn insultojn, kiajn li neniam estis aŭdinta direkti kontraŭ lin flanke de aliaj. Kiam li atingis, tra la tumulto de tiaj pensoj, la pordon de sia hejmo, situanta fine de l' vilaĝeto, li rapide entruigis la ŝlosilon, kiun li jam tenis enmane; li malfermis, eniris, refermis zorge; kaj ege dezirante troviĝi en fidinda kunuleco, li tuj vokis: «Perpetua!

Perpetua!», kaj samtempe ekiris al la salono, kie certe ŝi estis pretiganta la tablon por la vespermanĝo. Perpetua estis, kiel ĉiu divenas, la servantino de Don Abbondio: servantino amema kaj fidela, kapabla laŭokaze kaj obei kaj ordoni, siatempe toleri la grumbladojn kaj kapricojn de l' mastro, kaj siatempe igi lin toleri la ŝiajn, kiuj tagon post tago fariĝis pli oftaj, ek de kiam ŝi transis la sinodan aĝon de kvardek jaroj,¹⁴ restante fraŭlino, ĉar ŝi malakceptis ĉiujn sin proponintajn partiojn, kiel ŝi diradis, aŭ ĉar ŝi trovis eĉ ne hundon, kiu ŝin volus edzino, laŭdire de ŝiaj amikinoj.

«Tuj mi venas» ŝi respondis, dum ŝi metis en la kutiman lokon sur la eta tablo la flasketon de la vino preferata de Don Abbondio, kaj ŝi ekiris malrapide; sed ŝi ankoraŭ ne atingis la sojlon de l' saloneto, kiam li eniris, kun paŝo tiel trenata, kun rigardo tiel sombra, kun vizaĝo tiel veaspekta, ke ne bezonatus la spertaj okuloj de Perpetua, por unuavide malkovri, ke al li okazis io vere eksterordinara.

«Kompaton! kion vi havas, sinjoro mastro?»

«Nenion, nenion», respondis Don Abbondio, dum li falsidiĝis tute anhela sur sian seĝegon.

«Kiel, nenio? Ĉu vi volus tion kredigi al mi? Tiel veaspekta? Granda okazaĵo ja okazis».

«Ho, pro la ĉielo! Kiam mi diras: nenio, ĝi estas aŭ nenio, aŭ afero, kiun mi ne povas diri».

«Ĉu eĉ ne al mi vi povas diri? Kiu zorgos por via farto? Kiu donos al vi konsilon?...».

«Ho ve! silentu, kaj nenion alian surtabligu; nur donu al

¹⁴ *sinodan aĝon...*: la sinodo (aŭ koncilio) de Trento ordonis, ke virinoj nur pli ol 40-jaraj rajtas loĝi en hejmoj de romkatolikaj pastroj (kiuj estas devige celibataj).

mi glason de mia vino».

«Kaj ĉu vi volus al mi aserti, ke vi havas nenion!» diris Perpetua, plenigante la glason, kaj retenante ĝin enmane, kvazaŭ ŝi volus doni ĝin nur kiel premion por la konfidenco, kiu tiel longe ŝin atendigis.

«Donu ĉi tien, donu ĉi tien», diris Don Abbondio, kaj li forprenis de ŝi la glason per ne firma mano, kaj malplenigis ĝin rapide, kvazaŭ ĝi estus medikamento.

«Ĉu vi do volas min devigita demandi tra la popolo, kio do okazis al mia mastro?». diris Perpetua, stare antaŭ li, kun la manoj inversigitaj sur la flankoj, kaj la kubutoj antaŭen, fiksrigardante lin, kvazaŭ ŝi volus suĉi el liaj okuloj la sekreton.

«Pro la ĉielo! ne faru klaĉojn, ne faru kriaĉojn: riskiĝas... riskiĝas la vivo!».

«Ĉu la vivo?».

«Jes la vivo!».

«Vi ja scias, ke ĉiam, kiam vi diris al mi ion sincere, konfidence, mi neniam...».

«Brave! kiel tiam...».

Perpetua ekkomprenis, ke ŝi tuŝis misan klavon; tial, tuj ŝanĝante tonon: «Sinjoro mastro» ŝi diris kun emociita kaj emocianta voĉo, «mi ĉiam al vi estis amema; kaj se nun mi volas ekscii, ĝi estas pro zorgemo, ĉar mi volus helpi vin; al vi doni bonan konsilon, senpezigi vian animon...».

Fakte Don Abbondio verŝajne tiom multe deziregis ellasi sian doloran sekreton, kiom Perpetua aspiris ĝin ekscii; tial li, repuŝinte pli kaj pli feble ŝiajn pli kaj pli insistajn atakojn, pli ol unufoje ŝin ĵuriginte, ke ŝi tute ne paroletos, fine, kun multe da interrompoj, kun multe da ve-krioj, li al ŝi rakontis la veindan kazon. Ĉe alveno al la timeginda nomo de l'

komisiinto, Perpetua devis eldiri novan, pli solenan ĵuron; kaj Don Abbondio, post la eligo de tiu nomo, sin retrofaligis kontraŭ la seĝo-dorson, kun suspirego, levante la manojn, kun gesto samtempe ordona kaj petega, kaj dirante: «pro la ĉielo!»

«Unu el liaj fi-faroj!» elkriis Perpetua. «Ho kia kanajlo! kia perfortulo! kia homo sen Dia timo!».

«Ĉu vi ne volas silenti? aŭ ĉu vi volas tute pereigi min?».

«Ho! ni tie ĉi estas solaj, neniuj nin aŭdas. Sed kiel vi faros, povra sinjoro mastro?»

«Ho vidu», diris Don Abbondio kun kolera voĉo: «vidu kiajn bonajn konsilojn ŝi kapablas al mi doni! Ŝi min demandas, kiel mi faros, kiel mi faros; kvazaŭ ŝi mem estus en la kaĉo, kaj devus mi eltiri ŝin de ĝi».

«Verdire mi havus modestan konsilon por doni; sed poste...».

«Sed poste, ni aŭdu».

«Mia konsilo estas ke, ĉar ĉiuj diras ke nia ĉefepiskopo estas sankta viro, kaj energia viro, kiu neniun timas, kaj fieras, kiam li povas trudi ĝustan devon al unu el tiuj supertruduloj, por defendi simplan pastron; mi dirus kaj diras, ke vi skribu al li oportunan leteron, por lin informi, kiel, kiamaniere...».

«Ĉu vi ne volas silenti? ĉu vi ne volas silenti? Ĉu tiajn konsilojn doni al povrulo? Kiam min trafus pafo dorsen, Dio evitu! ĉu la ĉefepiskopo ĝin forprenus?».

«He! pafojn oni ne disdonas kiel bombonojn: kaj ve, se tiaj hundoj mordus ĉiufoje, kiam ili bojas! Kaj ĉiam mi vidis, ke al la homo kapabla minac-montri dentojn kaj estigi konsideron, oni donas respekton; kaj ĝuste pro tio, ke vi neniam volas diri vian rezonon, ni reduktiĝis al tio, ke ĉiuj venas, pardonu, por...».

«Ĉu vi ne volas silenti?».

«Mi tuj silentas; sed certe estas, ke kiam la mondo ekvidas, ke homo, ĉiufoje kaj ĉiu-renkonte, pretas mallevi la...».

«Ĉu vi ne volas silenti? Ĉu nun estas tempo por diri da tiaj stultaĵoj?».

«Sufiĉe: vi pripensos ĉi-nokte; sed ne damaĝu vin per vi mem, ne difektu vian sanon; glutu unu buŝplenon».

«Mi mem pripensos», grumble respondis Don Abbondio «certe, pripensos mi; ja mi devas pripensi». Kaj li leviĝis, dum li daŭrigis: «nenion mi volas; nenion: mi tute ne sentas apetiton; mi mem scias, ke tion pripensi apartenas al mi. Kio! Tio devis trafi ĝuste min».

«Glutetu almenaŭ ĉi-alian guton», diris Perpetua, englasigante. «Vi ja scias, ke ĉiufoje ĝi al vi rebonigas la stomakon».

«He! necesus alio, necesus alio, necesus alio». Kun tiuj vortoj, li prenis la lumilon, kaj plu grumblante: «eta bagatelo! al honestulo, kia mi! Kaj kiel iros la afero morgaŭ?» kaj aliajn similajn lamentojn, li ekiris supren al la dormo-ĉambro. Kiam li atingis la sojlon, li returniĝis al Perpetua, li metis la fingron sur la buŝon, li diris, kun malrapida kaj solena tono: «pro la ĉielo!» kaj malaperis.

II

Oni rakontas, ke la princo de Condé dormis profunde dum la nokto antaŭ la batalo en Rocroi. Sed unue li estis tre laca; due li jam donis ĉiujn necesajn dispoziciojn, kaj jam decidis, kion fari venont-matene. Don Abbondio, male, sciis ankoraŭ nenion, krom ke morgaŭ estos batal-tago; li do pasigis grandan parton de la nokto en angorplenaj memkonsultoj. Ĉu ignori la kanajlan ordonegon kaj la minacojn, kaj geedzigi la gefianĉan paron: tian solvon li eĉ ne konsideris. Ĉu konfidi al Renzo la okazintaĵon, kaj kun li elserĉi ian rimedon... Dio liberigu! «Eĉ ne unu vorton ellasu... se ne... *hm!*», estis dirinta unu el tiuj bravuloj; kaj reaŭdante sonori en la menso tiun *hm!*, Don Abbondio, krom forigi la personon malobservi tiun tian ordonon, eĉ pentis ke li klaĉis kun Perpetua. Ĉu fuĝi? Kien? Kaj poste! Kiom da ĝenoj, kaj kiom da pravigoj por doni! Ĉe ĉiu rifuzita solvo, la povrulo sin rulis enlite. Tio kio al li ŝajnis ĉiuflanke plej bona, aŭ malplej aĉa solvo, estis tempumi, kaj fari al Renzo longajn prokrastojn. Ĉi-koncerne li ekmemoris, ke mankas malmulte da tagoj al la tempo de nupto-malpermeso¹; – kaj se mi sukcesas regi tiun ĉi knabegon dum ĉi-kelke da tagoj, poste mi disponos du monatojn; kaj, dum du monatoj, gravaj okazaĵoj ja povas okazi. – Li remaĉis pretekstojn por prezenti; kaj, kvankam ili al li ŝajnis iom bagatelaj, tamen li sekurigis sin per la penso, ke lia aŭtoritato ŝajnigos ilin ĝustapezaj, kaj ke lia longa sperto al li donos grandan avantaĝon super malklera junuleto. – Ni vidos – li al si diris: – li pensas pri l' fianĉino, sed mi pensas pri transvivo: mi mem do estas pli interesata, preter tio, ke mi estas pli

¹*Nupto-malpermeso*: la tiama eklezia kalendaro malpermesis religiajn nuptojn ek de la 12-a de novembro ĝis la 6-a de januaro.

sagaca. Kara fileto, se vi sentas brulon, mi ne scias kion diri; sed mi ne volas kompromitiĝi. Post kiam li iom fiksis ĉi tiel la animon ĉe unu decido, li fine sukcesis okulfermi: sed kia dormo! kiaj sonĝoj! Bravuloj, Don Rodrigo, Renzo, padoj, rokoj, forkuroj, persekutoj, krioj, pafoj.

La vekiĝo, post malfeliĉa evento, kaj meze de impliko, estas tre maldolĉa momento. La menso, apenaŭ rekonscia, revenas al la kutimaj ideoj de l' antaŭa trankvila vivo; sed subite la penso pri l' nova situacio sin prezentas krudaĉe, kaj ties ĉagreno estas pli viva ĉe tiu momenta komparo. Tragustinte tian ĉagrenan momenton, Don Abbondio tuj resumis siajn noktajn planojn, ilin konfirmis kaj ordigis pli bone, leviĝis, kaj restis atende de Renzo, kun timo kaj samtempe malpacienco.

Lorenzo, aŭ, kiel ĉiuj diris, Renzo, ne longe atendigis lin. Tuj kiam al li ŝajnis, ke la horo estas ne maldiskreta, por sin prezenti al la pastro, li iris al li, kun la gaja impeto de l' dudekjara viro, kiu devas en tiu tago edzinigi sian amatinon. Li restis sen gepatroj ek de sia adoleskaĝo, kaj li praktikis la metion de silko-ŝpinisto, heredan, por tiel diri, en sia familio; metion tre profito-donan en la pasintaj jaroj; tiutempe jam dekadencan, sed ne tiagrade, ke lerta laboristo ne povus el ĝi perlabori honestan vivtenon. La laborpostenoj de tag' al tago malpliigis; sed la konstanta for-migrado de laboruloj logitaj al najbaraj landoj per promesoj, privilegioj kaj altaj salajroj, efikis ke ne mankis laboro al restintoj enlande. Krom tio, Renzo posedis bieneton, kiun li kultivigis, kaj kultivis li mem, kiam la ŝpinejo restis fermita; tiel ke, sia-nivele, li rajtis konsideri sin bonstata. Kvankam tiu jaro estis eĉ pli magra ol la antaŭaj, kaj oni jam komencis sperti veran malsategon,

tamen nia junulo, kiu ek de kiam li turnis la okulojn al Lucia, fariĝis pli ŝparema, estis sufiĉe provizita, kaj ne devis barakti kontraŭ malsato. Li aperis antaŭ Don Abbondio grand-parade, kun diverskoloraj plumoj surĉapele, kun bel-tenila ponardo en la pantalon-poŝo, kaj kun mieno festeca kaj samtempe braveca, tiutempe kutima eĉ ĉe la viroj plej kvietaj. La hezita kaj mistera akcepto de Don Abbondio strange kontrastis kun la gajecaj kaj rezolutaj gestoj de l' junulo.

– Povas esti ke li havas ian zorgon enkape, – konjektis Renzo en si mem; poste li diris: «Mi venis, respektinda pastro, por ekscii, kiomahore al vi komfortos, ke ni troviĝu en la preĝejo».

«Pri kiu tago vi parolas?». «Kiel, pri kiu tago? ĉu vi ne memoras, ke estas fiksita por hodiaŭ?». «Ĉu hodiaŭ?» replikis Don Abbondio, kvazaŭ li unuafoje aŭdus paroli pri tio. «Hodiaŭ, hodiaŭ ... vi paciencu, sed hodiaŭ mi ne povas!». «Ĉu hodiaŭ vi ne povas! Kio estiĝis?». «Antaŭ ĉio, mi ne sentas min bonfarta, vidu».

«Mi bedaŭras; sed tio kion vi devas fari, estas tiel momenta, tiel malpeza...».

«Kaj krome, krome, krome...».

«Kaj krome kio?».

«Kaj krome estas da implikaĵoj».

«Ĉu implikaĵoj? Kiaj implikaĵoj povus esti?».

«Oni troviĝu en mia situacio, por kompreni kiom da ĝenoj estiĝas ĉe tiaj aferoj, kiom da praviĝoj por doni. Mi estas tro bonkora, mi nur zorgas forigi malhelpojn, ĉion faciligi, fari laŭ alies plaĉo, kaj mi neglektas mian devon; poste min trafas riproĉoj, kaj eĉ pli aĉe».

«Sed, enorme de l' ĉielo, ne tenu min tiel streĉita, kaj al

mi diru klare kaj malkaŝe, pri kio temas».

«Ĉu vi scias, kiom kaj kiaj formalajtoj necesas, por fari regulan geedziĝon?».

«Mi mem ja devas ion scii pri tio», diris Renzo kun incitiĝo, «ĉar per tio vi jam sufiĉe rompis al mi la kapon en ĉi-pasintaj tagoj. Sed ĉu ne jam solviĝis ĉio? Ĉu ne estas farita ĉio farenda?».

«Ĉio, ĉio, ŝajnas al vi; ĉar, vi paciencu, la bestaĉo estas mi mem, kiu neglektas mian devon, por ne penigi aliulojn. Sed nun... sufiĉe, mi ja scias, kion mi aludas. Ni, povraj pastroj, kuŝas inter amboso kaj martelo: vi, senpacienca; mi kompatas vin, povra junulo; kaj la superuloj... sufiĉe, ne ĉion oni povas diri. Kaj kompromitaj estas ni mem». «Sed klarigu al mi finfine, kio do estas tiu alia formalajto por fari, kiel vi diras, kaj tuj ĝi estos farita».

«Ĉu vi scias, kiom estas la prohibantoj nuligantaj?».

«Kion vi volas, ke mi sciu pri prohibantoj?».

«Error, conditio, votum, cognatio, crimen,

Cultus disparitas, vis, ordo, ligamen, honestas,

*Si sis affinis,...*²» komencis Don Abbondio, kalkulante per la fingro-pintoj.

«Ĉu vi primokas min?» interrompis la junulo. «Kion vi volas, ke mi faru per via *Latinumo*?».

«Se do vi ne scias la aferojn, vi paciencu, kaj konfidu vin je tiu, kiu konas ilin». «Ek!...».

«Nu, kara Renzo, ne koleriĝu, ĉar mi pretas fari... ĉion,

²*Error...affinis*: latinlingva listo de la kazoj, kiuj laŭ la eklezia juro malpermesis aŭ nuligis edzecon, t.e.: eraro pri persono, aŭ pri ties vivkondiĉo; religia voto; parenceco; certaj krimoj; malsama religio; perforto; pastra ordino; edzeca ligo; certaj kazoj de malhonesteco; boparenceco.

kio dependas de mi. Mi, mi volus vidi vin kontenta; mi amas vin. He!... kiam mi pensas, ke tiel bone vi statis; kio al vi mankis? En via kapo ekzumis la grilo edziĝi...».

«Kia parolo estas ĉi tia, sinjoro mia?» eksplodis Renzo, kun mieno inter miro kaj kolero.

«Estas nur dirmaniero, vi paciencu, nur dirmaniero. Mi volus vidi vin kontenta».

«Entute...».

«Entute, kara fileto, mi ne kulpas pri tio; la leĝon ne faris mi. Kaj antaŭ ol plenumi geedzigon, ni estas tute devigitaj fari multege da esploroj, por certiĝi, ke ne estas da prohibantaj kazoj».

«Nu diru al mi finfine, kia prohibaĵo intervenis?». «Vi paciencu, ne temas pri aferoj deĉifreblaj ĉe-momente. Espereble estos nenijaĵo; tamen, tiujn ĉi esplorojn ni devas fari. La teksto estas klara kaj kristala: *antequam matrimonium denunciēt...*»³.

«Mi al vi diris, ke Latinon mi ne volas».

«Sed mi ja devas al vi klarigi...». «Sed ĉu vi ne jam faris tiajn ĉi esplorojn?». «Mi al vi diras, ke ne ĉiujn mi faris, kiel mi devus».

«Kial vi ne faris ilin ĝustatempe? kial diri al mi, ke ĉio estas farita? kial prokrasti...». «Jen! vi al mi riproĉas mian troan bonkorecon. Mi ĉion plifaciligis, por vin servi pli frue: sed... sed nun al mi intervenis iaj... sufiĉe, mi scias».

«Kaj kion vi volus, ke mi faru?». «Ke vi paciencu dum kelke da tagoj. Kara fileto, entute kelke da tagoj ne estas eterneco: vi paciencu».

«Kiom longe?». – Ni atingis havenon – pensis en si mem

³ *antequam...*: latine = antaŭ ol publikigi (farotan) geedziĝon...

Don Abbondio; kaj kun plej afekta maniero, «nu», li diris «en dek kvin tagoj mi klopodos,... mi strebos...». «Dek kvin tagoj! jen novaĵo! Oni faris ĉion, kion vi volis; oni fiksis la tagon; jen la tago venis; kaj nun vi diras al mi, ke mi atendu dek kvin tagojn! Dek kvin...» li ripetis, kun voĉo pli laŭta kaj kolera, kaj li etendis la brakon, kaj pugne batis la aeron; kaj neniu scias, kian diablaĵon li alkroĉus al tiu nombro, se Don Abbondio ne lin interrompus, kaptante ties alian manon, kun timema kaj zorgema amindeco: «nu, nu, ne incitiĝu, pro la ĉielo. Mi vidos, klopodos, ĉu en unu semajno...».

«Kaj al Lucia, kion mi diru?».

«Ke mi mem fuŝis».

«Kaj kio pri la klaĉoj de la popolo?».

«Ja diru al ĉiuj, ke mi mem fuŝis, pro tro da hasto, pro tro da bonkoreco; la tutan kulpon ĵetu sur min. Ĉu mi povus paroli pli bone? Nu, nur unu semajnon».

«Kaj poste, ĉu ne plu estos aliaj prohibantoj?».

«Kiam mi al vi diras...».

«Nu bone: mi paciencados unu semajnon; sed tute kredu, ke post ĝia forpaso mi ne plu kontentiĝos per babiloj. Dume mi vin riverencas». Post tiuj vortoj, li foriris, kun sinklino antaŭ Don Abbondio malpli profunda ol kutime, kaj kun rigardo pli esprimiva ol respektema.

Elirinte, li ekiris unuafoje malvolonte direkte al la hejmo de sia promesita edzino, dum en sia kolero li konsideris la ĵusan interparolon; kaj li ĝin trovis pli kaj pli stranga. La malvarma kaj embarasa akcepto-maniero de Don Abbondio, lia parolo pena kaj samtempe senpacienca, tiaj du grizaj okuloj, kiuj, dum lia parolo, daŭre disfuĝis ĉi tien kaj tien, kvazaŭ ili timus renkonti la vortojn elirantajn el lia buŝo, tio

ke li sin montris preskaŭ nescia pri geedziĝo tiel eksplicite interkonsentita, kaj ĉefe lia daŭra aludo pri gravega afero, neniam dirante ion klaran: ĉiuj ĉi kunmetitaj eroj igis Renzon pensi, ke subestas mistero malsama ol tiu, kiun Don Abbondio volis kredigi. La junulo hezitis momente, ĉu reiri, por lin meti en seneskapejon, kaj lin devigi paroli pli klare; sed, levante la okulojn, li ekvidis Perpetua-n marŝanta antaŭ li kaj eniranta en etan legom-ĝardenon, distancan kelkpaŝe de l' hejmo. Dum ŝi malfermis la ĝarden-pordon, li al ŝi vokkriis; akcelis la paŝadon, ŝin atingis, ŝin retenis ĉe-sojle, kaj, kun la intenco elspuri ion pli konkretan, li ekhaltis, por ekparoli kun ŝi.

«Bonan tagon, Perpetua: mi esperis, ke hodiaŭ oni kunestos gaje».

«Ba! tio kion volas Dio, mia povra Renzo».

«Faru al mi komplezon: tiu benata viro, nome la respektinda pastro, kuiraciis al mi rezonojn, kiujn mi ne tute sukcesis kompreni; klarigu vi pli bone, kial do li ne povas aŭ ne volas geedzigi nin hodiaŭ».

«Ho! Ĉu vi opinias, ke mi konas la sekretojn de mia mastro?». – Mi prave konjektis, ke subestas mistero, – pensis Renzo; kaj por ĝin malkovri, li daŭrigis: «Nu, Perpetua, ni estas geamikoj; diru al mi, kion do vi scias; helpu al malriĉa knabo».

«Estas malbonŝance naskiĝi malriĉa, mia kara Renzo».

«Tio estas vero», li reparolis, dum li pli kaj pli konfirmis siajn suspektojn; kaj strebante pli proksimiĝi al la problemo, «tio estas vero», li ripetis «sed ĉu ĝuste pastroj devus mistrakti malriĉulojn?». «Aŭskultu, Renzo; mi nenion povas diri, ĉar... nenion mi scias; sed jenon mi povas certigi: ke mia mastro volas fari maljustaĵon nek al vi nek al iu ajn; kaj li tute ne

kulpas». «Kiu do kulpas?» demandis Renzo, kun senzorga gesto, sed kun suspensa koro kaj streĉita orelo.

«Se mi al vi diras, ke nenion mi scias... Tamen, plede por mia mastro, mi rajtas paroli; ĉar mi suferas, kiam oni lin kulpigas, kvazaŭ li volus ĉagreni onin. La povrulo! Se li pekas, ĝi estas pro troa bonkoreco. Ja vivas en ĉi-mondo da kanajloj, da perfortuloj, da homoj ne timantaj Dion...».

– Perfortuloj! kanajloj! – ekpensis Renzo: – ne temas pri ekleziaj superuloj. «Nu», li aldonis, pene kaŝante sian kreskantan agitiĝon, «nu, diru al mi, kiu do estas».

«Ha! vi volus min paroligi; sed paroli mi ne povas, ĉar... nenion mi scias; kiam mi scias nenion, estas kvazaŭ mi estus ĵurinta silenti. Vi povus eĉ torturi min per ŝnuro, sed nenion vi eldevigus el mia buŝo. Adiaŭ; estus perdita tempo por ambaŭ». Tion dirante, ŝi rapide eniris la legomejon, kaj fermis ties pordon. Renzo reciprokis la saluton kaj retroiris tute senbrue, por ke ŝi ne rimarku, kien li sin direktas; sed kiam li estis for de la aŭdeblo de la bona virino, li ekrapidis; dum unu momento li atingis la hejm-pordon de Don Abbondio; li eniris, direktiĝis rekte al la salono, kie li estis lin lasinta, li trovis lin tie, kuris al li, kun aŭdaca maniero, kaj strabigitaj okuloj.

«He! he! Kia novaĵo ĝi estas?» diris Don Abbondio.

«Kiu do estas la supertrudulo», diris Renzo kun voĉtono de l' homo rezoluta postuli precizan respondon, «kiu do estas la supertrudulo, kiu ne volas, ke mi edzinigu Lucia-n?». «Kio? kio? kio?» balbutis la povra surprizito, kun vizaĝo subite blanka kaj molaĉa kiel ĵus lavita ĉifono. Kaj plu grumblante, li eksaltis el sia granda seĝo, por sin ĵeti al la pordo. Sed Renzo, kiu ja atendis tian movon kaj viglis, tien saltis antaŭ li, turnis la ŝlosilon, kaj ĝin enpoŝigis.

«Ha! ha! ĉu vi nun parolos, sinjoro pastro? Miajn aferojn scias ĉiuj, escepte de mi. Ankaŭ mi mem, diable, volas ilin ekkoni. Kiel nomiĝas tiu viro?». «Renzo! Renzo! pro kompatato, konsideru, kion do vi faras; pensu pri via animo».

«Mi pensas, ke mi volas ĝin ekscii tuj, ĉi-momente». Kaj ĉe tiuj vortoj li metis, eble senintence, la manon sur la tranĉiltenilon, kiu elstaris el la poŝo.

«Kompaton!» elkriis Don Abbondio kun apenaŭa voĉo.

«Mi volas ĝin ekscii».

«Kiu al vi diris...?». «Ne, ne; ne plu da babiloj. Parolu klare kaj tuje».

«Ĉu vi volas min morta?». «Mi volas ekscii tion, kion mi rajtas scii».

«Sed se mi parolas, mi pereos. Ĉu mi ne devus zorgi pri mia vivo?». «Parolu do!». Tiu «do» estis eldirita tiel energie, la aspekto de Renzo fariĝis tiel minaca, ke Don Abbondio ne plu eĉ supozis, ke li povas malobei.

«Ĉu vi al mi promesas, ĉu vi al mi ĵuras», li diris «kun neniu priparoli, neniam diri...».

«Mi promesas, ke mi faras frenezaĵon, se vi al mi ne diras tuj-tuj la nomon de tiu homo».

«Ĉe tia nova ĵur-minaco, Don Abbondio, kun mieno kaj rigardo de havanto enbuŝe tenajlon de dent-eltiristo, eldiris: «Don...».

«Don?» ripetis Renzo, kvazaŭ por helpi la pacienton eligi la reston; kaj li staris kurbe, kun la orelo klinita super lia buŝo, kun la brakoj malantaŭen etenditaj kaj la manoj forte pugnigitaj.

«Don Rodrigo!» eldiris haste la devigito, kaj li urĝis tiujn kelkajn silabojn, kaj trenaciis la konsonantojn, parte pro la

agitiĝo, kaj parte ĉar li aplikis la malgrandan atenton, kiu ankoraŭ al li restis libera, por kompromisi inter la du teruroj, kvazaŭ li volus forŝteli kaj malaperigi tiun vorton ĝuste en la momento, kiam li estis devigita ĝin eligi.

«Ha hundaĉo!» kriegis Renzo. «Kaj kiumaniere? Kion li diris al vi, por...».

«Kiel, ĉu? kiel?» respondis kun indign-afekta voĉo Don Abbondio, kiu, post tiel granda ofero, nun sentis sin iel kreditoro. «Kiel, ĉu? Mi volus ke tio trafus vin mem, kiel ĝi trafis min, kiu tute ne estas koncernata; tiuokaze al vi tute ne restus tiom da griloj en la kapo». Kaj tiam li komencis pripentri per teruraj farboj la aĉan renkontiĝon; kaj ĉe la rakontado, pli kaj pli konsciante la grandan koleron, kiun li havis en si mem, kaj kiu ĝis tiam restis kaŝita kaj envolvita en la teruro, kaj samtempe vidante ke Renzo, inter kolero kaj konfuzo, staris senmova, kun mallevita kapo, li daŭrigis tute verve: «ja belan agon vi faris! Vi faris al mi belan servon! Ĉi tian baton al honestulo, al via parokestro! en lia hejmo! en sankta loko! Vi faris ja belan bravaĵon! Por eldevigi el mia buŝo mian malbonon, vian malbonon! Tion kion mi kaŝis por prudento, por via bono! Kaj kio nun, kiam vi ĝin scias? Mi volus vidi, ke vi al mi farus... Pro la ĉielo! Ne estas ŝerco. Ne temas pri pravo aŭ malpravo; temas pri forto. Kaj kiam ĉi-matene mi donis al vi bonan konsilon... he! tuj furioze. Mi havis prudenton por mi kaj por vi; sed kion fari? Almenaŭ malfermu; redonu mian ŝlosilon».

«Povas esti, ke mi mistrafis», respondis Renzo kun voĉo mildigita rilate al Don Abbondio, sed en kiu sentiĝis la furiozo kontraŭ la malkovrita malamiko: «povas esti, ke mi mistrafis; sed metu la manon sur vian koron, kaj pripensu, ĉu en mia

kazo...». Ĉe tiuj vortoj li jam elpoŝigis la ŝlosilon, kaj iris malfermi. Don Abbondio sekvis lin, kaj dum tiu turnis la ŝlosilon en la seruro, li proksimiĝis, kaj kun serioza kaj angora vizaĝo, levante antaŭ liaj okuloj la unuajn tri fingrojn de la dekstra mano, kvazaŭ por al li helpi siaflanke, «almenaŭ ĵuru...» al li diris.

«Povas esti, ke mi mistrafis; kaj pardonu min», respondis Renzo, malfermante, kaj elironte.

«Ĵuru...» replikis Don Abbondio, kaptante lian brakon per tremanta mano.

«Povas esti, ke mi mistrafis», ripetis Renzo, liberigante sin de li; li foriris impete, kaj per tio finis la diskuton, kiu, same kiel ajna diskuto pri literaturo aŭ filozofio aŭ alio, povus daŭri eĉ jarcentojn, ĉar ambaŭ nenion faris, krom ripetadi ĉiu sian argumenton.

«Perpetua! Perpetua!» ekkriis Don Abbondio, post vana klopodo revoki la forkurinton. Perpetua ne respondas: Don Abbondio ne plu sciis, en kia mondo li troviĝas.

Jam pli ol unufoje okazis, eĉ al roluloj pli altrangaj ol Don Abbondio, ke ili troviĝis en tiel ĝenaj krizoj, en tia malcerteco pri solvoj, ke ŝajnis al ili plej bona elturniĝo enlitiĝi kun febro. Tian elturniĝon Don Abbondio ne devis elserĉi, ĉar ĝi mem sin prezentis. La hieraŭa teruro, la nokta angora maldormo, la ĵusa timo kaj la ansieco pri l' estonto tion efikis. Anhela kaj konfuza, li delasis sin denove sur sian grandan seĝon, li komencis senti ekstremojn en la ostoj, li rigardadis siajn ungojn kun suspiroj, kaj li vokis de temp' al tempo, per tremanta kaj kolereta voĉo: «Perpetua!». Ŝi venis finfine, kun granda brasiko sub la brako, kaj kun aplomba mieno, kvazaŭ nenio estus okazinta. Mi indulgas al la leganto la lamentojn, la

kondolencojn, la kulpigojn, la pledojn, la «nur vi povis paroli», la «mi ne parolis», entute ĉiujn implikojn de tiu interparolo. Sufiĉu diri, ke Don Abbondio ordonis al Perpetua meti ŝlosaŝtangojn je la pordo, ne plu malfermi, pro nenia motivo, kaj, se iu frapetus, respondi tra la fenestro, ke la pastro enlitiĝis pro febro. Poste li malrapide supren-iris la ŝtuparon, dirante ĉe ĉiu tria ŝtupo: «jen mi taŭge servita»; kaj li sin kuŝigis en lito, kie ni lin lasos.

Renzo intertempe marŝis hejmen furioza-paŝe, ne decidinte kion fari, sed kun dezirego fari ion strangan kaj teruran. La provokantoj, la perfortuloj, ĉiuj kiuj iamaniere faras maljustaĵojn al aliuloj, kulpas ne nur pro la malbono kiun ili mem faras, sed ankaŭ pro la malico, al kiu ili instigas la animojn de la ofenditoj. Renzo estis junulo paca kaj malinklina al sango, homo senruza kaj malamika de ĉia insido; tamen, en tiuj momentoj, lia koro nur batis por murdo, lia menso nur fantaziumis pri embusko. Li volus alkuri al la domo de Don Rodrigo, lin kapti je la kolo, kaj... sed li memoris, ke ĝi estas kvazaŭ fortikaĵo, provizita per bravuloj interne, kaj gardata ekstere; ke nur amikoj kaj tute konataj servistoj eniras libere, ne ekzamenite ĝisplande; ke nekonata modesta metiisto ne povus eniri ne esplorigite, kaj ke precipe li mem en tiu loko... verŝajne estas eĉ tro konata. Tiam li imagis preni sian pafilon, sin kuŝ-kaŝi malantaŭ heĝo, atende ĉu eventuale... ĉu eventuale tiu viro pasas sola; li profundiĝis, kun feroce plezuriĝo, en tian fantaziaĵon, li imagis aŭdi paŝo-bruon... ĝuste tiun paŝo-bruon, levi silente la kapon; li rekonas la fiulon, li tien turnas la pafilon, li celas, li pafas, li vidas lin fali kaj barakti, li krias liadirekte malbenon, kaj rapidas landlimen, por eskapi. – Kaj kio pri Lucia? – Tuj kiam tiu

nomo ĵetiĝis inter tiujn fiajn fantaziaĵojn, tien amasiĝis la plej bonaj pensoj, kiuj estis kutimaj en la menso de Renzo. Li memoris pri la lastaj admonoj de siaj gepatroj, li rememoris pri Dio, pri la Madono kaj sanktuloj, pri la konsolo, kiun multfoje li ĝuis, ke li estas senkrima, pri la hororo, kiun plurfoje li sentis, ĉe l' rakonto pri murdo; kaj el tiu revo pri sango kun teruro li rekonsciiĝis, kun rimorso, kaj samtempe kun speco de ĝojo, ke li nur imagis. Sed la penso pri Lucia, kiom da aliaj pensoj kuntrenis! Tiom da esperoj, tiom da promesoj, estonteco tiel revata, tiel taksata certa, kaj tiu tago, tiom sopirata! Kaj kiel, per kiaj vortoj anonci al ŝi ĉi tian novaĵon? Kaj poste, kion decidi? Kiel ŝin edzinigi, spite la forton de tiu fia potenculo? Kaj kune kun ĉi-ĉio, lian menson okupis ne tuta suspekto, sed turmenta ombro. Nur brutala pasio por Lucia povis naski tian supertrudaĵon de Don Rodrigo. Kaj kio pri Lucia? La penso, ke ŝi allasis al li eĉ minimuman pretekston, plej etan logaĵon, eĉ ne tuŝetis la kapon de Renzo. Sed ĉu ŝi sciiĝis? Ĉu tiu viro povus koncipi tian fian pasion, sen ke ŝi tion ekvidus? Ĉu li irigus la aferojn ĝis tia grado, sen provo tenti ŝin iamaniere? Kaj tamen Lucia neniam diris eĉ unu vorton al li, al sia fianĉo!

Regate de tiaj pensoj, li pasis antaŭ sia hejmo, meze de l' vilaĝo, ĝin preteriris, kaj sin direktis al la hejmo de Lucia, kiu situis fine, eĉ iom ekstere de la vilaĝo. Antaŭ tiu dometo kuŝis eta korto, kiu ĝin disigis de la strato kaj estis ĉirkaŭbarita per mureto. Renzo eniris la korton, kaj ekaŭdis konfuzan zumadon el supra ĉambro. Li imagis ke temas pri amikinoj kaj kunulinoj venintaj eskorti Lucia-n; kaj li ne volis sin elmontri al tia vendejo, kun tia novaĵo enkore kaj surmiene. Knabineto, kiu troviĝis en la korto, ekkuris al li renkonte, kriante: «la

edzo! la edzo!». «Silentu, Bettina, silentu!» diris Renzo. «Venu ĉi tien; iru supren al Lucia, tiru ŝin aparten, kaj diru al ŝi ĉe-orele... sed gardu vin, ke neniu aŭdu, nek suspektu!... diru ke mi bezonas paroli al ŝi, ke mi atendas ŝin en la teretaĝa ĉambro, kaj ke ŝi venu tuj». La knabineto rapide supreniris la ŝtupojn, ĝoja kaj fiera ke ŝi havas sekretan komision por plenumi.

Lucia ĝuste tiam eliris, tute eleganta, el la manoj de la patrino. La amikinoj rabis konkure la nov-edzinon, kaj perfortis, por ke ŝi elmontru sin: kaj ŝi sin ŝirmis, per la batalema modesteco de l' kampulinoj: ŝi kovris per la kubutoj la vizaĝon, klinis ĝin al la brusto, kaj kuntiris la longajn nigrajn brovojn, dum la buŝo tamen malfermiĝis al rideto. La nigraj kaj junaj kapharoj, dis-kombitaj surfrunte laŭ blanka, fajna streko, volviĝis malantaŭ la kapo je pluraj helikaj plektaĵoj, trapikitaj per longaj arĝentaj pingloj elstaraj ĉirkaŭen, kvazaŭ aŭreol-radioj,⁴ kiel ankoraŭ kutimas kampulinoj en Milano. Ĉirkaŭ la kolo ŝi havis kolieron el skarlataj bidoj⁵ alternaj kun filigranaj⁶ or-butonoj: ŝi surportis belan korseton flore brokitan,⁷ kun apartaj manikoj, alligitaj per belaj rubandoj: nelongan jupon el kruda silko, kun pluraj plisoj, du ruĝegajn strumpojn, du broditajn silkajn babuŝojn.⁸ Krom tiu ĉi, kiu estis la speciala ornamaĵo de l' nupto-tago, Lucia havis la alian, ĉiutagan, el modesta beleco, kiun tiumomente reliefigis kaj pliigis la diversaj sentoj, kiuj

⁴ *aŭreolo* proprasence estas luma radiado ĉirkaŭ la bildo de sanktuloj.

⁵ *bidoj*: traboritaj ornamaj globetoj.

⁶ *filigranaj*: el kunteksitaj or(kolor)aj dratoj.

⁷ *brokitan*: kun surteksitaj silkaj desegnoj.

⁸ *babuŝo* estas speco de pantoflo sen postaĵo nek dika kalkanumo.

pentriĝis sur ŝia vizaĝo: ĝojo, kiun mildigis apenaŭa emocio: tiu kvietaj korpremo, kiu aperas de temp' al tempo sur la vizaĝo de nov-edzinoj kaj, sen ĝeni la belecon, donas al ĝi specialan aspekton. La eta Bettina sin enŝovis en la rondon, proksimiĝis al Lucia, kaj lerte al ŝi komprenigis, ke ŝi havas ion por komuniki, kaj al ŝi diris sian paroleton ĉe-orele.

«Mi foriras momente, kaj tuj revenas», diris Lucia al la virinoj; kaj rapide ŝi desupris. Rimarkante la ŝanĝitan mienon kaj la malkvietan teniĝon de Renzo, «kio estas?» ŝi diris, ne sen terura antaŭsento.

«Lucia!» respondis Renzo, «por hodiaŭ ĉio fuŝiĝis; kaj nur Dio scias, kiam ni povos esti geedzoj».

«Kio?» diris Lucia konsternite. Renzo al ŝi rakontis resume la matenan okazintaĵon: ŝi aŭskultis kun angoro: kaj kiam ŝi ekaŭdis la nomon de Don Rodrigo, «ha!» ŝi elkriis, ruĝiĝante kaj tremante, «ĝis tia grado!». «Vi do sciis...?» diris Renzo.

«Jes, bedaŭrinde!» respondis Lucia; «sed ĝis tio!». «Kion vi sciis?». «Ne igu min paroli nun, ne igu min plori. Mi rapidas voki panjon, kaj forsaluti la virinojn: necesas ke ni restu solaj».

Dum ŝi ekiris, Renzo flustris: «Vi diris al mi nenion».

«Ha, Renzo!» respondis Lucia, turnante sin momente, sed ne haltante. Renzo tute komprenis ke lia nomo, eldirite de Lucia en tia momento, kun tia tono, signifas: ĉu vi povas dubi, ke mi silentis sen pravaj kaj honestaj kialoj?

Dume la bona Agnese (tiele nomiĝis la patrino de Lucia), suspektigite kaj scivola pri l' ĉe-orela paroleto, kaj pro l' malapero de la filino, jam desupris, por vidi, pri kia novaĵo temas. La filino ŝin lasis kun Renzo, reiris al la kunvenintaj

virinoj, regis laŭpove la mienon kaj la voĉtonon, kaj ŝi diris: «la respektinda parokestro malsanas; kaj hodiaŭ nenion oni faros». Tion dirinte, ŝi rapide forsalutis ĉiujn, kaj denove desupris.

La virinoj foriris, kaj disiris rakonti la okazintaĵon. Du aŭ tri el ili iris ĝis la dompordo de la pastro, por konstati, ĉu vere li malsanas.

«Febrego», respondis Perpetua tra la fenestro; kaj la trista vorto, raportite al la ceteraj virinoj, ĉesigis la konjektojn, kiuj jam ekzumis en iliaj cerboj, kaj komencis anonciĝi, stumpaj kaj misteraj, en iliaj paroloj.

III

Lucia eniris la ter-etaĝan ĉambron, dum Renzo kun angoro informis Agnese-n, kiu kun angoro lin aŭskultis. Ambaŭ sin turnis al ŝi, kiu sciis pli multe ol ili, kaj el kiu ili atendis klarigon, kiu povos nur esti dolora; kaj, en sia doloro, ili montris, ĉiu laŭ sia diversa amsento al Lucia, diversan ĉagrenon, ke tian aferon ŝi prisilentis al ili. Agnese, kvankam malpacienca aŭskulti la filinon, ne evitis fari al ŝi riproĉon: «Al via patrino nenion diri pri tia afero!».

«Nun mi diros al vi ĉion», respondis Lucia, viŝante al si la okulojn per la antaŭtuko.

«Ci¹ parolu, ci parolu! – Vi parolu, vi parolu!» kriis samtempe la patrino kaj la fianĉo.

«Plej sankta Virgulino!²» elkriis Lucia: «kiu do kredus, ke la aferoj povos atingi ĝis tio!». Kaj, kun voĉo rompita de l' ploro, ŝi rakontis, kiel, antaŭ nemulte da tagoj, dum ŝi revenis de la ŝpinejo, ŝi postrestis disde siaj kunulinoj, kaj ŝin preterpasis Don Rodrigo kune kun alia senjoro; ke Don Rodrigo provis reteni ŝin per babiloj, kiel ŝi diris, tute ne belaj; sed ŝi, tute ne lin aŭskultante, rapidis atingi la kunulinojn; kaj dume ŝi aŭdis la alian senjoron ridegi, kaj Don Rodrigon diri: ni vetu. La postan tagon tiuj senjoroj troviĝis denove surstrate; sed Lucia marŝis meze de la kunulinoj, kun mallevitaj okuloj; kaj la alia senjoro ridaĉis, kaj Don Rodrigo diris: ni vidos, ni vidos. «Dank' al Dio», daŭrigis Lucia, «estis la lasta labortago ĉe la ŝpinejo. Mi tuj rakontis...».

¹Ci: en la itallingva teksto, Agnese kutime ci-diras al Renzo kaj Lucia; ĉi-lastaj vi-diras unu al la alia. Ni tradukas tiun ĉi distingon nur ĉi tie.

² *Plej sankta...*: interjekcia alvoko al sankta Maria, virga patrino de Jesuo.

«Al kiu vi rakontis?» demandis Agnese, kiu scivolis, ne sen kolereto, la nomon de la preferita konfidenculo.

«Al patro Cristoforo, ĉe pek-konfeso, panjo», respondis Lucia kun dolĉa tono de senkulpiĝo. «Mi ĉion al li rakontis, kiam lastafoje mi iris kune kun vi al la monakeja preĝejo: kaj, se vi memoras, tiun matenon mi entreprenis jen unu jen alian aferon, por prokrasti, atende ke aliaj vilaĝanoj pasos tiudirekten, por trairi la vojon kune kun ili; ĉar, post tiu renkontiĝo, la stratoj kaŭzis al mi grandan teruron...».

Ĉe l' respektata nomo de patro Cristoforo, la indigno de Agnese mildiĝis. «Bone vi kondukis», ŝi diris, «sed kial ne rakonti ĉion ankaŭ al via patrino?».

Lucia havis du pravajn kialojn: unue ne ĉagreni nek teruri la bonan virinon pri afero, kontraŭ kiu ŝi ne povos trovi rimedon; due, eviti la riskon irigi tra multaj buŝoj historieton, kiun ŝi volis ĵaluze kaŝita, des pli ke Lucia esperis, ke ŝia edziniĝo ĉesigos ĉe l' naskiĝo tian abomenindan persekuton. Lucia tamen menciis nur la unuan el la du kialoj.

«Kaj al vi», ŝi aldonis, turnante sin al Renzo, kun la voĉtono de homo, kiu volus ke amiko agnosku sian malpravon: «kaj al vi, ĉu mi estus devinta paroli pri tio? Vi ĝin scias nun, bedaŭrinde!».

«Kaj kion al vi diris la respektinda patro?» demandis Agnese.

«Li diris, ke mi strebu kiel eble plej urĝi la geedziĝon, kaj dume mi restu enfermita hejme; ke mi intense preĝu al la Di-Sinjoro; kaj espereble tiu senjoro, ne vidante min, ne plu zorgos pri mi. Kaj ĝuste tiam mi faris klopodon», ŝi daŭrigis, turnante sin denove al Renzo, sed ne levante la okulojn al lia vizaĝo, kaj tute ruĝiĝante, «ĝuste tiam mi kondukis senhonte,

kaj mi mem petis finaranĝi la aferon antaŭ la fiksita tempo. Mi ne scias, kion vi pensis pri mi! Sed mi agis bon-intence, kaj mi estis konsilita, kaj mi taksis kiel certan... kaj ĉi-matene mi estis tiel for de la penso...». Ĉi tie ŝiajn vortojn interrompis fortega plor-eksplodo.

«Ha kanajlo! ha damnito! ha murdisto!» kriis Renzo, dum li diskuris tra la ĉambro, kaj de tempo al tempo premis la tenilon de sia tranĉilo.

«Ho kia impliko, pro la ĉielo!» elkriis Agnese. La junulo subite ekhaltis antaŭ Lucia, kiu ploris; li rigardis ŝin kun esprimo de ĉagrena kaj rabia tenereco, kaj diris: «Ĝi estas la lasta fi-faro de tiu murdisto».

«Ha! ne, Renzo, pro la ĉielo!» ekkriis Lucia. «Ne, ne, pro la ĉielo! La Di-Sinjoro ĉeestas ankaŭ por malriĉuloj; kaj kiel vi volus, ke li nin helpu, se ni malbonfaras?». «Ne, ne, pro la ĉielo!» ripetadis Agnese.

«Renzo», diris Lucia, kun mieno esprimanta esperon kaj pli trankvilan rezolutecon: «vi havas metion, kaj mi kapablas labori; ni iru tiel foren, ke li ne plu aŭdu pri ni». «Ha Lucia! kaj kio poste? Ni ankoraŭ ne estas geedzoj! Ĉu la pastro konsentos doni al ni la atestilon pri libera statuso?³ Tia homo? Se ni jam estus geedzoj, tiam ja...».

Lucia ploris denove: kaj la triopo restis en silento, kaj en deprimiĝo, kiu triste kontrastis kun la festa pompo de iliaj vestaĵoj.

«Aŭdu, filetoj; aŭskultu min» diris Agnese post kelke da momentoj. «Mi venis en ĉi-mondon antaŭ vi; kaj la mondon mi konas iomete. Oni ne teruriĝu tiele; la diablo ne estas tiel

³*libera statuso*: atestilo, ke la gefianĉoj ne havas alian edzecan ligon, kaj do rajtas geedziĝi.

aĉa, kia oni lin desegnas. Al ni, la malriĉuloj, la implikoj ŝajnas pli komplikaj, ĉar ni ne scipovas trovi la ŝlosilojn; sed foje konsilo, vorteto de homo, kiu estas klera... mi ja scias, kion mi aludas. Faru laŭ mia konsilo, Renzo; iru al Lecco; serĉu pri doktoro Impliktrafulo, rakontu al li... sed, pro la ĉielo, ne nomu lin ĉi tiel: ĝi estas moknomo. Oni diru: sinjoro doktoro... Nu, kiel li nomiĝas? Ho jen! la veran nomon mi ne scias: ĉiuj nomas lin Impliktrafulo. Sufiĉe, demandu pri tiu doktoro alta, seka, senhara, kun ruĝa nazo, kaj rubusa makuleto⁴ survange».

«Mi konas lin laŭvide», diris Renzo.

«Bone», daŭrigis Agnese «li estas granda eminentulo! Mi vidis pli ol unu homo, pli embarasita ol kokido en stupo, kaj ne scianta kien albati la kapon, kiu, post unuhora restado vid-al-vide kun doktoro Impliktrafulo (gardu vin, ne voki lin ĉi tiel!), mi lin vidis primoki la aferon. Prenu tiujn kvar kaponojn, kompatindajn!, al kiuj mi intencis tordi la kolon por la venontdimanĉa festeno, kaj ilin portu al li; ĉar al tiaj moŝtuloj neniam oni sin prezentu kun malplenaj manoj. Rakontu al li la tutan okazintaĵon; kaj vi vidis ke li tuj-tuj al vi diros aferojn, kiujn ni ne imagus, eĉ cerbumante dum tuta jaro».

Renzo akceptis tre volonte tiun konsilon; Lucia ĝin aprobis; kaj Agnese, fiera pri sia propono, deprenis unu post alia la povrajn bestojn el la kaĝego, kunmetis iliajn ok krurojn, kvazaŭ ŝi formus florbukedon, ilin ĉirkaŭvolvis kaj ligis per ŝnureto, kaj enmanigis ilin al Renzo; kiu, post interŝanĝo de esperigaj vortoj, eliris tra la flanko turnita al la legom-ĝardeno, por ke lin ne vidu la knaboj, kiuj postkurus, kriante:

⁴ *rubusa makuleto*: haŭtmakulo malhelruĝa kiel rubus-bero.

la edzo! la edzo! Tiel li foriris tra kampaj padoj, kolerplena, repensante sian misfortunon, kaj remaĉante la parolon dirotan al doktoro Impliktrafulo. La leganto mem imagu, kiel statis dumvojaĝe tiuj povraj bestoj, tiel ligite kaj tenate je la kruroj, kun la kapoj malsupren, enmane de viro, kiu, ekscitate de tiom da pasioj, akompanis per gestoj la pensojn, kiuj tumulte trapasis lian menson. Jen li etendis la brakon kolere, jen li ĝin levis malespere, jen li svingis ĝin enaere kvazaŭ minace, kaj ĉiamaniere li energie skuis ilin, kaj saltetigis tiujn kvar pendantajn kapojn; kiuj dumtempe klopodis kunbekiĝi reciproke, kiel tro ofte okazas inter malfeliĉaj samsortanoj.

Li atingis la urbeton, kaj demandis pri la loĝejo de la doktoro; oni indikis ĝin al li, kaj tien li iris. Ĉe l' eniro, lin kaptis tiu sento de malsupereco, kiu trafas malriĉajn kaj malklerajn homojn proksime de moŝtaj kaj erudiciaj, kaj li forgesis ĉiujn preparitajn parolojn; sed li ekrigardis la kaponojn kaj per tio li kuraĝigis sin. Enirinte la kuirejon, li demandis la servistinon, ĉu eblas paroli al sinjoro doktoro. Ŝi okulumis al la bestoj, kaj, kiel homo kutima ricevi tiajn donacojn, ŝi metis la manojn sur ilin, kvankam Renzo klopodis ilin reteni, por ke la doktoro vidu kaj sciu, ke li alportas ion. Tiu alvenis ĝuste dum la virino diris: «donu al mi kaj eniru». Renzo faris grandan sinklinon; la doktoro akceptis lin humanece, per «venu, fileto», kaj lin enkondukis kun si en la oficejon. Temis pri ĉambrego, sur kies tri vandoj pendis la portretoj de la dek du Cezaroj; la kvaran kovris granda bretaro kun malnovaj kaj polvozaj libroj; meze, tablo tutplena de atestiloj, peticioj, aktaroj, kriaĵoj, kun tri aŭ kvar seĝoj ĉirkaŭe, kaj, ĉe unu flanko, granda brakseĝo kun alta, kvadrata dorso, kies anguloj kulminis per du lignaj ornamaĵoj elstaraj

kvazaŭ kornoj, tegita per bovina ledo, garnita per dikaj najlokapoj, el kiuj kelkaj jam delonge falis, kaj lasis liberaj la angulojn de la tegaĵo, kiu refaldiĝis ĉi tie kaj tie. La doktoro estis en negliĝo⁵, tio estas surportis eluzitan togon, kiun antaŭ multe da jaroj li uzis por oratori en la solenaj tagoj, kiam li iris al Milano por grava juĝafero. Li fermis la pordon, kaj kuraĝigis la junulon per jenaj vortoj: «fileto, diru al mi vian kazon». «Mi volas al vi diri konfidencan vorton».

«Jen mi», respondis la doktoro: «parolu». Kaj li sidigis sin sur la seĝegon. Renzo, stare antaŭ la tablo, kun unu mano interne de la ĉapelo, kiun li turnis per la alia mano, reparolis: «Mi volas ekscii de vi, kiu studis...».

«Diru al mi la fakton, kia ĝi statas», interrompis la doktoro.

«Vi bonvolu pardoni min: ni, la malriĉuloj, ne scias paroli ĝustamane. Mi volus do ekscii...».

«Benataj homoj! Tiaj estas vi ĉiuj: anstataŭ rakonti fakton, vi volas fari demandojn, ĉar vi jam havas enkaŭpe viajn planojn».

«Pardonu min, sinjoro doktoro. Mi volas ekscii, ĉu minaco farita al pastro, por ke li ne faru geedzigon, estas punata per leĝo».

– Mi komprenis – diris en si mem la doktoro, kiu tute ne komprenis. – Mi komprenis. – Kaj li tuj fariĝis serioza, el seriozeco esprimanta kompaton kaj zorgemon; li forte kunpremis la lipojn, kaj eligis obtuzan sonon, kiu aludis senton, pli poste esprimitan en liaj unuaj vortoj: «Kazo serioza, fileto; kazo leĝe koncernata. Estas bone, ke vi venis al mi. Estas kazo klara, konsiderita en cento da kriaĵoj, kaj...

⁵ *negliĝo*: sencere monia, hejma vesto.

ĝuste en unu de la pasinta jaro, de l' nuna senjoro guberniestro. Mi nun ĝin vidigas kaj tuŝigas al vi».

Post tiuj vortoj li leviĝis el sia seĝego, kaj enŝovis la manon en tiun ĥaoson el paperoj, miksanter ilin desube supren, kvazaŭ li metus tritikon en grenujon.

«Kie do ĝi estas? Eliru, eliru. Nepras do havi tiom da aferoj ĉe-mane! Tamen ĝi nepre estas ĉi tie, ĉar grava kriaĵo ĝi estas. Ha! jen, jen». Li ĝin prenis, ĝin malfaldis, rigardis la daton, kaj kun mieno eĉ pli serioza li elkriis: «La 15-an de oktobro 1627! Certe; ĝi estas de la pasinta jaro; freŝa kriaĵo; el tiuj, kiuj plejmulte teruras. Ĉu vi scias legi, fileto?». «Iomete, sinjoro doktoro».

«Bone, sekvu min per la okulo, kaj vi vidos». Kaj, kun la kriaĵo etendita en-aere, li komencis legi, grumblante rapidege ĉe iuj lokoj, kaj emfazante distinge kun granda esprimivo ĉe aliaj, laŭbezone.

«Kvankam, per kriaĵho publikigita ordone de senjoro Duko de Feria 14-an de decembro 1620, kaj konfirmita de tre Emin. kaj tre Ekscel. Moshto Senjoro Gonzalo Fernandez de Cordova, kaj tiel plu, estis per eksterordinaraj kaj rigoraj dispozicioj disponite kontrau subpremojn, malversaciojn⁶ kaj tiranecajn agajhojn, kiujn iuj audacas fari kontrau chi tiujn tiel sindonajn al Lia Majesto Vasalojn, tamen ofteco de ekscesoj, kaj malico, kaj tiel plu, kreskis tiagrade, ke tio devigis Lian Ekscel. kaj tiel plu. Sekve de tio, kun konsento de Senato kaj de iu Komitato, kaj tiel plu, li decidis publikigon de chi tio.

«Kaj deirante de tiranecaj agajhoj, char sperto montras,

⁶ *malversaciojn*: kontrauleĝajn eldevigojn de mono faratajn de administrantoj.

ke multaj uloj, tiel en Urboj kiel en Vilaghoj... ĉu vi aŭdas? de tiu chi Shtato tiranece eldevigas pagojn kaj subpremas plej malfortulojn plurmaniere, kiel ekzemple perforte devigante acheto- kaj luo-kontraktojn... kaj tiel plu: kie do vi estas? ha! jen; aŭdu: chu sekvos au ne sekvos geedzighoj. Ĉu? ». «Estas mia kazo», diris Renzo.

«Aŭdu, aŭdu, enestas eĉ alio; kaj poste ni vidos la punon. Chu oni atestos au ne atestos; chu iu forirus de loko kie li loghas, kaj tiel plu; chu tiu pagu shuldon; tiu alia ne ghenulin, tiu iru al lia muelejo: tio tute ne koncernas nin. Ha, jen, ni trafis: tiu pastro ne farus tion, al kio li estas ofice devigita, au farus aferojn, kiujn li ne rajtas. Ĉu?». «Ŝajnas, ke oni faris la kriaĵon ĝuste por mi».

«Ĉu? vere, ĉu ne? aŭdu, aŭdu: kaj aliaj similaj perfortoj, fare de feudestroj, nobeloj, mezranguloj, malnobeloj kaj plebanoj. Ne eblas eskapi: enestas ĉiuj: same kiel la Jozafata juĝo-valo⁷. Aŭdu nun la punon: Kvankam chiuj chi kaj similaj malbonfarajhoj jam estas malpermesitaj, tamen, ĉar konvenas apliki pli grandan rigoron, Lia Eksc., per chi tio, nenion esceptante, kaj tiel plu, ordonas kaj komandas, ke kontraŭ malobservantojn je ajna el supremenciitaj punktoj, au alia simila, chiuj ordinaraj jughistoj de chi tiu Shtato procedu al mona kaj korpa puno, kaj ankau al relegacio⁸ au galero, kaj ech al mortpuno... eta bagatelo! arbitre de Lia Ekscelenco, au de Senato, lau kvalito de kazoj, personoj kaj cirkonstancoj. Kaj tio ne-in-dul-ge-ble kaj kun tuta rigoro, kaj tiel plu. Da aferoj enestas, ĉu ne? Kaj vidu ĉi tie la subskribojn: Gonzalo

⁷ *Jozafata juĝo-valo*: loko kie, laŭ Biblia rakonto, Dio juĝos ĉiujn homojn senescepte.

⁸ *relegacio*: ekzilo en difinitan lokon.

Fernandez de Cordova; kaj pli sube: *Platonus*; kaj ankaŭ ĉi tie: *Vidit Ferrer*⁹: nenio mankas».

Dum la doktoro laŭtleĝis, Renzo lin sekvis malrapide per la okulo, dum li klopodis eltiri klaran koncepton kaj mirrigardi tiujn sanktegajn vortojn, kiuj, al li ŝajnis, devos esti lia helpilo. La doktoro miris, vidante la novan klienton pli atenta ol terurita. – Ĉu eble spertulaĉo li estas –, li pensis en si mem. «Ha! ha!» li diris poste: «vi tamen al vi tondigis la hartufon. Vi estis singarda: tamen, vin konfidonte al miaj manoj, tion vi ne bezonis. La kazo ja estas serioza; sed vi ne scias, kion fari mi aŭdacus, ĉe-okaze! ». Por kompreni ĉi tian eldiraĵon de la doktoro, oni sciu aŭ rememoru, ke tiuepoke la profesiaj bravuloj kaj ĉiuspecaj krimuloj kutimis surporti longan hartufon, kiun, alfrontante onin, ili tiris survizaĝen, se la entrepreno estis el tiuj, kiuj postulas kaj perforton kaj singardon, kaj ili taksis, ke necesas sin maskumi. La kriaĵoj ne restis silentaj pri tia modo. *Ordonas Lia Ekscelenco* (la markizo de la Hynojosa) ke kiu surportos kapharojn tiom longajn, ke tiuj kovrus frunton ghis brovoj ekskluzive, au surportos plektajhon, antau au malantau oreloj, tiun trafu puno de tricent eskudoj; kaj en kazo de ne-poveco, de tri jaroj de galero por unua fojo, kaj, por dua, aldone al menciita, ancorau pli granda puno, mona kaj korpa, arbitre de Lia Ekscelenco.

Li tamen permesas, ke okaze de kalveco, au pro alia ghusta kauzo de cikatro au vundo, rajtu tiaj homoj, por plia digno kaj sano sia, surporti harojn tiom longaj, kiom bezonaj por kovri tiajn difektojn, kaj neniom pli; tute zorgante ne

⁹ *Gonzalo... Platonus... vidit* (latine = vidis) *Ferrer*: respektive la guberniestro, la sekretario kaj la grand-kanceliero.

superi bezonon kaj nuran neceson, por ke ilin ne trafu puno kontraŭ ceteraj malobservantoj fiksita.

Kaj same li ordonas al barbiroj, kontraŭ puno de cent eskudoj au de tri ŝnur-tiroj al ili farotaj publike, kaj pli granda ech korpa puno, arbitre kiel supre, ke ili, harojn tondante, lasu nenian specon de menciitaj plektajhoj tufajhoj bukrajhoj, nek harojn pli longaj ol ordinare, tiel frunte kiel flanke kaj malantaŭ oreloj, sed ke chiuj estu egalaj, kiel supre, escepte kazon de kalvuloj au aliaj difektuloj, kiel dirite. La tufo do estis kvazaŭ parto de la armaĝo, kaj distingilo de bravulaĉoj kaj fiuloj; kiuj el tio pli poste estis kutime nomataj tufuloj. Tiu ĉi termino restis, kaj ankoraŭ vivas, sed kun pli milda senco, en la dialekto: kaj verŝajne ĉiu el niaj Milanaj legantoj senescepte aŭdis, en sia infanaĝo, aŭ la gepatrojn, aŭ la instruiston, aŭ hejman amikon, aŭ serviston diri pri li: li estas tufulo, li estas tufuleto.

«Verdire, mi, kiel povra knabo», respondis Renzo, «dum mia vivo neniam surportis tufon.» «Nenion ni efikas», respondis la doktoro, kaj li skuis la kapon, kun rideto inter malica kaj senpacienca. «Se vi ne fidas je mi, nenion ni efikas. Kiu diras mensogojn al la doktoro, vidu fileto, tiu estas malsaĝulo, kiu diros la veron al la juĝisto. Al advokato oni diru la aferojn klaraj: al ni mem apartenas ilin konfuzi. Se vi volas, ke mi helpu vin, vi devas diri al mi ĉion, ek de a ĝis z, kun malfermita koro, kiel al konfesprenanto. Vi devas al mi diri la nomon de la persono, de kiu vi ricevis la komision: kompreneble temos pri konsiderinda persono; kaj, en tia ĉi kazo, mi faros al li laŭdevan omaĝ-viziton. Mi tute ne al li diros, ke vi al mi sciigis, ke li mem komisiis vin: vi fidu. Mi al li diros, ke mi venas peti protekton por povra kalumniita

junulo. Kaj kun li mi faros la oportunajn konsentojn por laŭdinda elturniĝo. Vi tute komprenu ke, savante sin mem, li savos ankaŭ vin. Kaj eĉ se la friponaĵo estus tute via, nu, mi ne retiriĝas: mi elturnis aliajn el eĉ pli aĉaj embarasoj... Kondiĉe ke vi ne ofendis konsiderindan personon, kompreneble, mi min devigas elturni vin el impliko: kun iom da spezo, kompreneble. Vi devas al mi diri, kiu do estas la ofendito, kiel oni diras; kaj laŭ la rango, la kvalito kaj la humoro de la amiko, oni vidos, ĉu konvenas lin regi eluzante protektojn, aŭ eltrovi rimedon, por lin ataki sur kriminala tereno, kaj enŝovi suspekton en lian cerbon; ĉar vidu, se lerte manipuli la kriaĵojn, neniu estas kulpa kaj neniu senkulpa. Koncerne la pastron, se li estas prudentulo, li restos tut-silenta; se temas pri obstina kapeto, troviĝas rimedo ankaŭ por tiaj. El ĉia implikaĵo eblas elturniĝi; sed necesas lerta homo: kaj via kazo estas serioza; serioza, mi ripetas, serioza: la kriaĵo klare proklamas; kaj se la afero devus decidiĝi senpere inter la justico kaj vi, ve al vi. Mi al vi parolas kiel amiko: la misfarojn oni devas punpagi: se vi volas elturniĝi glate: monon kaj sincerecon, fidi al homo, kiu vin amas, obei, fari ĉion, kio estas al vi sugestota».

Dum la doktoro eligadis ĉiujn ĉi-vortojn, Renzo rigardis lin kun gapa atento, kiel krudulaĉo en-place rigardadas iluziiston, kiu, enbuŝiginte stupon kaj stupon kaj stupon, eligas rubandon kaj rubandon kaj rubandon, senfine. Sed kiam li ĝuste komprenis, kion do la doktoro intencas diri, li tranĉis la rubandon en lia buŝo, dirante: «ho! sinjoro doktoro, kion do vi komprenis? La afero statas tute male. Mi nenium minacis; mi tute ne faras da tiaj aferoj: kaj pridemandu mian tutan komunumon, kaj vi vidos ke neniam mi havis koncernon kun

la justico. La friponaĵon oni faris al mi; kaj mi venas al vi, por ekscii, kion fari, por ricevi justecon; kaj mi ja kontentas, ke mi vidis tiun kriaĵon».

«Diable!» elkriis la doktoro, malfermegante la okulojn. «Kiajn fuŝaĵojn vi al mi faras? Sed tiel estas; tiaj estas vi ĉiuj: ĉu eblas ke vi tute ne kapablas diri la aferojn klaraj?».

«Sed pardonu min; por tio vi ne lasis al mi tempon: mi nun rakontos al vi la aferon, kiel ĝi statas. Sciu do, ke mi devus edzinigi hodiaŭ» kaj ĉi tie la voĉo de Renzo emociiĝis, «mi devus edzinigi junulinon, kun kiu mi fianĉece parolis ek de ĉi tiu somero; kaj hodiaŭ, mi al vi ripetas, estis la tago konsentita kun la respektinda pastro, kaj ĉio estis aranĝita. Sed jen, la respektinda pastro elmetas iajn pretekstojn... sufiĉe, por ne tedi vin: mi, kiel prave, lin devigis paroli klare; kaj li al mi konfesis, ke estas al li malpermesite, per mort-minaco, fari tiun ĉi geedzigon. Tiu perfortulo, nome Don Rodrigo...».

«He nu!» tuj lin interrompis la doktoro, kaj li kuntiris la brovojn, ŝrumpigis la ruĝan nazon, kaj tordis la buŝon: «he nu! Kial do vi venas rompi al mi la kapon per ĉi tiaj babiloj? Tiajn ĉi parolojn diradu inter vi mem, kiuj tute ne kapablas bridigi la vortojn; kaj ne venu ilin rakonti al honestulo, kiu konas ilian gravecon. For, for; vi ne scias, kion vi diras: kun bubaĉoj mi ne enmiksas min; mi ne volas aŭdi parolojn ĉi-specajn: aerajn parolojn».

«Mi al vi ĵuras...».

«For, mi ripetas: kion mi faru per viaj ĵuroj? Tio ne min koncernas: mi lavas miajn manojn¹⁰». Kaj la manojn li

¹⁰ *mi lavas miajn manojn*: t.e. mi nenian respondecon volas. Aludo al evangelia rakonto pri guberniestro Pilato, kiu, anstataŭ absolvi Jesuon, “lavis siajn manojn”, t.e. permesis lian mort-kondamnon.

interfrotis, kvazaŭ li vere lavus ilin. «Lernu paroli: oni ne tiele surprizu honestulon».

«Sed aŭdu, sed aŭdu», vane diradis Renzo: la doktoro plu kriis kaj lin puŝis per la manoj ĝis la pordo; li malfermis, vokis la servistinon, kaj al ŝi diris: «Tuj redonu al tiu ĉi viro tion kion li portis: mi nenion volas, nenion volas».

Tiu virino dum la tuta tempo de sia restado en tiu hejmo neniam estis plenuminta tian ordonon: sed ĝi estis eldirita tiom rezolute, ke ŝi ne hezitis obei. Ŝi prenis la kvar povrajn bestojn kaj donis ilin al Renzo, kun malŝate kompatema okulumo, kvazaŭ ŝi dirus: nepras, ke aĉan kaĉon vi kuiraciis. Renzo volus ceremonii; sed la doktoro estis nevenkebla; kaj la junulo, plej mirigita kaj kolera, devis repreni la malakceptitajn viktimojn, kaj reveni al la vilaĝo, por rakonti al la virinoj la belan frukton de sia ekspedicio.

La virinoj, dum lia foresto, post malĝoja demeto de la festaj vestaĵoj kaj surmeto de la labortagaj, rekomencis interkonsulti, Lucia singultante kaj Agnese suspirante. Post kiam ĉi-lastaj bele parolis pri la grandaj rezultatoj esperindaj el la konsiloj de la doktoro, Lucia diris ke necesas klopodi sin helpi ĉiamaniere; ke patro Cristoforo estas taŭga homo, ne nur por konsili, sed ankaŭ por mem agi, se temas pri helpo al malriĉuloj; kaj ke estus ege dezirinde povi al li sciigi la okazintaĵon. «Certe», diris Agnese; kaj ambaŭ komencis elserĉi la rimedon por tion efektivigi: ĉar ili ne kuraĝis iri mem, en tiu tago, al la monakejo, distanca eble du mejlojn: kaj certe neniu prudenta homo tion al ili konsilus. Sed, dum ili diskutis la diversajn solvojn, aŭdiĝis pordo-frapo, kaj samtempe ne-laŭta sed komprenebla «*Deo gratias*»-saluto. Lucia, imagis, kiu do povas esti, kaj alkuris malfermi; kaj tuj,

post familiara sinklineto, eniris laika almozpetanta kapuceno, portante sur la maldekstra ŝultro dusakon, kies aperturon li tenis tordita kaj premita ambaŭmane surbruste.

«Ho, frato Galdino!» diris ambaŭ virinoj.

«La Di-Sinjoro estu kun vi», diris la frato. Mi venas por la kvesto de nuksoj.

«Iru preni nuksojn por la respektindaj patroj», diris Agnese. Lucia leviĝis kaj ekiris al la alia ĉambro. Sed antaŭ ol eniri tien, ŝi haltetis dorse de frato Galdino, kiu ankoraŭ staris en la sama pozicio, kaj kun fingro ĉe la buŝo ŝi turnis al la patrino rigardon, por peti sekretecon, kun tenereco, kun preĝpeto, kaj ankaŭ kun ia aŭtoritateco.

La kvestisto, tiel malproksime gvatante al Agnese, diris: «kaj kio pri l' geedziĝo? Ĝuste hodiaŭ ĝi devus okazi: mi konstatis iom da konfuzo en la vilaĝo, kvazaŭ estus okazinta ia novaĵo. Kio do estiĝis?».

«La respektinda pastro malsanas, kaj necesas prokrasti», rapide respondis la virino. Se Lucia ne estus farinta tiun signon, verŝajne la respondo estus alia. «Kaj kiel sukcesas la kvesto?» ŝi aldonis, por ŝanĝi temon.

«Ne multe, bona virino, ne multe. Jen ĉio». Tion dirante, li deŝultrigis la dusakon, kaj salt-balancis ĝin inter la manoj. «Jen ĉio; kaj por kolekti ĉi tian abundaĵon, mi devis frapeti je dek pordoj».

«Ba! La jarrikoltoj ja magras, frato Galdino; kaj kiam necesas domaĝi la panon, ne eblas malŝpari l' ceteron».

«Kaj por revenigi abundon, kia rimedo estas, mia bona virino? Almozo! Ĉu vi konas tiun miraklon pri l' nuksoj, okazintan antaŭ multe da jaroj, en tiu kapucenejo de Romagna-regiono? ». «Verdire ne; rakontu do ĝin».

«Ho! Vi do sciu, ke en tiu monakejo vivis unu el niaj patroj, kiu estis sanktulo, kaj nomiĝis patro Macario. Ian vintran tagon, dum li trairis padon en kampo de iu nia bonfaranto, same tre bonvirta viro, patro Macario vidis tiun bonfaranton staranta apud sia granda nuksarbo; kaj kvar kampulojn, kun levitaj hakfosiloj, kiuj komencis elfosi, por elmeti ties radikojn al la sunradioj. - Kion do vi faras pri tiu povra arbo? demandis patro Macario. - He! patro, jam plurajn jarojn ĝi ne volas fari nuksojn; kaj mi faras el ĝi brullignon. - Lasu ĝin, diris la patro: sciu, ke ĉi-jare ĝi donos pli da nuksoj ol da folioj. La bonfaranto, kiu ja sciis, kia homo diris tiun parolon, tuj ordonis al la laboristoj kovri denove per tero la radikojn; kaj li vokis la patron, jam pluirantan sian vojon: - Patro Macario, li al li diris, duono de la rikolto estos por la monakejo. - Disvastiĝis la famo pri la antaŭdiro; kaj ĉiuj alkuris, por vidi la nuksarbon. Fakte, printempe, da floroj abundege, kaj siatempe: da nuksoj abundege. La bonkora bonfaranto ne ricevis la ĝojon bat-rikolti ilin, ĉar antaŭ la rikolto li iris ricevi la Dian rekompencon¹¹ pro sia karitato. Sed la miraklo estis des pli granda, kiel vi aŭdos. Tiu bonkora viro postlasis filon el tute malsama kvalito. Nu do, ĉe l' rikolto, la kvestisto iris, por ricevi la duonon ŝuldatan por la kapucenejo; sed la homo ŝajnis tutan malscion, kaj li eĉ aŭdacis respondi, ke neniam li aŭdis, ke kapucenoj kapablas estigi nuksojn. Ĉu vi scias, kio do okazis? Iun tagon (aŭdu jenon!) la fripono invitis samspecajn amikojn, kaj, inter diboĉoj, li rakontis la historieton pri la nuksarbo, kaj primokis la fratojn. La fi-junuloj ekdeziris vidi tiun senmezuran nuksumason, kaj li supren kondukas ilin en la grenejon. Sed aŭdu:

¹¹rekompencan: la transmondan premion.

li malfermas la pordon, li iras direkte al la angulo, kie demetita la granda amaso, kaj dum li diras: rigardu, li mem rigardas kaj vidas... kion? Grandegan amason da sekaj nuksofolioj! Ĝi estis taŭga ekzemplo, ĉu ne? Kaj la monakejo, anstataŭ malgajni, eĉ profitis; ĉar, post tia granda evento, la kvesto de nuksoj gajnis tiom multe, tiom multe, ke iu bonfaranto, pro kompatado al la povra kvestisto, karitate donacis al la monakejo azenon, por helpi porti la nuksojn hejmen. Kaj oni faris el la nuksoj tiom da oleo, ke ĉiu malriĉulo venis ĉerpi laŭbezone; ĉar ni estas kiel la maro, kiu ricevas akvon ĉiuflanke, kaj denove ĝin disdonas al ĉiuj riveroj».

Ĉe tio reaperis Lucia, kun la antaŭtuko tiom ŝargita per nuksoj, ke ŝi pene subtenis ĝin, tenante per streĉitaj brakoj ties du angulojn supren. Dum frato Galdino denove deŝultrigis la dusakon, demetis ĝin kaj malligis ties aperturon, por enŝuti la abundan almozon, la patrino mienis mirigite kaj severe al Lucia, pro ŝia malŝparemo; sed Lucia al ŝi turnis rigardon, kiu signifis: mi pravigos min. Frato Galdino ektorentis je laŭdoj, bondeziroj, promesoj, dankesprimoj, kaj, metinte denove la dusakon surŝultren, ekiris. Sed Lucia lin revokis kaj diris: «mi volus de vi komplezon; mi volus, ke vi diru al patro Cristoforo, ke mi havas grandan urĝon paroli al li, kaj ke li karitatu veni senprokraste al ni, povrulinoj; ĉar ni mem ne havas eblecon iri al la preĝejo».

«Ĉu vi ne volas alion? Ne forpasos unu horo, kaj patro Cristoforo ekscios vian deziron».

«Mi fidas».

«Ne dubu». Post tiuj vortoj li foriris, iom pli kurba kaj pli kontenta ol ĉe l' alveno.

Vidante, ke malriĉa knabino tiel familiare venigis patron

Cristoforo, kaj ke la kvestisto akceptis la komision sen miro nek kontraŭdiro, neniu imagu, ke tiu patro Cristoforo estis mez-nivela frateto, ne ŝatinda homo. Male, li estis viro tre prestiĝa en la kapucenejo kaj la tuta ĉirkaŭregiono. Sed tia estis la situacio de l' kapucenoj, ke nenio al ili ŝajnis tro malalta nek tro altnivela. Servi al plej grandaj mizeruloj, kaj ricevi servon de potenculoj; eniri kaj palacojn kaj kabanaĉojn kun sama humileco kaj sekureco; esti foje, en la sama domo, amuzilo kaj la persono sen kiu oni nenion decidus; almozpeti ĉiuloke, kaj almozdoni al ĉiuj petantoj ĉe la monakejo: kapuceno estis kutimigita al ĉio. Marŝante surstrate, kapuceno same povus trafi en princon, kiu respektoplene al li kisas la pinton de la tali-ŝnuro, aŭ en araĉon de knaboj, kiuj, ŝajnigante interbaton, al li trafas la barbon per koto. La vorto «frato» estis tiuepoke eldirata plej respekte kaj plej malŝate: kaj la kapucenoj, eble pli ol ceteraj ordenoj, estis celo de l' du malaj sentoj, kaj ilin trafis la du opoziciaj ŝancoj; ĉar, nenion posedante, kaj surportante robon pli strange malkutiman, kaj pli malkaŝe praktikante humilecon, ili pli multe elmetis sin al la respektego kaj insultego, kiujn tia vivo-maniero povas altiri laŭ la diversaj homaj humoroj kaj penso-manieroj.

Post la foriro de frato Galdino, «tiom da nuksoj!» elkriis Agnese: «en ĉi tia jaro!». «Panjo, pardonu min», respondis Lucia; «sed, se ni donus tiom da almozo kiom aliuloj, nur Dio scias kiom longe frato Galdino devus ankoraŭ vagi, antaŭ ol plenigi la dusakon; nur Dio scias, kiam li revenus al la monakejo; kaj, ĉe ĉiuj dirotaj kaj aŭskultotaj babiloj, nur Dio scias, ĉu li memorus...».

«Bone vi elpensis; kaj krome, ĝi estas karitato, kiu ĉiam donas bonan frukton», diris Agnese, kiu, malgraŭ siaj

malvirtetoj, estis tre bonkora virino kaj sin ĵetus eĉ en fajron por tiu ununura filino, en kiu kuŝis ŝia tuta plezuriĝo.

Ĉe tio, alvenis Renzo, kaj enirante kun mieno samtempe spitema kaj hontigita, li ĵetis la kaponojn sur tablon; kaj ĝi estis la lasta malĝoja aventuro de la povraj bestoj, tiutage.

«Ja belan konsilon vi al mi donis!» li diris al Agnese. «Vi sendis min al bonkora honestulo, al homo, kiu vere helpas malriĉulojn!». Kaj li rakontis sian interparolon kun la doktoro. La virino, mirigite pro tiel aĉa rezultato, volus pruvi ke tamen la konsilo estis bona, kaj ke Renzo verŝajne ne faris la aferon laŭdeve; sed Lucia interrompis la diskuton, anoncante, ke espereble ŝi trovis pli bonan helpon. Renzo akceptis ankaŭ ĉi tiun esperon, kiel okazas ĉe homoj en malfeliĉo kaj impliko. «Sed se la patro ne trovas rimedon», li diris «mi mem ĝin trovos iamaniere».

La virinoj konsilis pacon, paciencon, prudenton.

«Morgaŭ », diris Lucia, «patro Cristoforo certe venos; kaj vi vidos ke li trovos unu el la rimedoj, kiajn ni, la malriĉuloj, eĉ ne scipovas imagi».

«Tion mi esperas»; diris Renzo, «sed ĉiukaze mi scipovos plenumi mian rajton, aŭ plenumigi ĝin. En ĉi-mondo ja estas justeco fin-fine».

Tra la doloraj paroloj kaj la iroj kaj reiroj de ni raportitaj, tiu tago jam forpasis; kaj vespero komenciĝis.

«Bonan nokton», diris malĝoje Lucia al Renzo, kiu ne scipovis decidi foriri.

«Bonan nokton», respondis Renzo, eĉ pli malĝoje.

«Espereble ia sanktulo helpos nin», replikis Lucia: «prudentu, kaj rezignaciu». La patrino aldonis aliajn similajn konsilojn; kaj la promes-edzo foriris, kun tempesta koro, plu

ripetante tiujn strangajn vortojn: «En ĉi-mondo ja estas justeco fin-fine!». Ĉar ja veras, ke homo superregata de granda ĉagreno ne plu konscias, kion li diras¹².

¹² *ne plu konscias*: ironie dirite: ĉar laŭ Manzoni en ĉi-mondo ne espereblas vera justeco.

IV

La suno ankoraŭ ne tute estis aperinta ĉe l' horizonto, kiam patro Cristoforo eliris de sia kapucenejo en Pescarenico, por alsupri al la dometo, kie li estis atendata. Pescarenico estas vilaĝeto ĉe l' maldekstra bordo de Adda-rivero, aŭ, ni preferas diri, de la lago, ne tre distance de la ponto: areto da domoj, plejparte loĝataj de fiŝistoj, ĉi tie kaj tie festonitaj¹ per trameloj² kaj retoj etenditaj por sekigo. La monakejo situis (kaj la konstruaĵo plu staras) ekstere, fronte al la vilaĝ-enirejo; kaj meze kuŝas la strato, kiu de Lecco kondukas al Bergamo. La ĉielo estis tute serena: laŭgrade ke la suno leviĝis dorse de l' monto, ĝia lumo desupris de la pintoj de la kontraŭaj montoj, kvazaŭ disvolviĝante rapide dekliven kaj valen. Aŭtuna venteto, deŝirante de l' branĉoj velkintajn morus-arbajn foliojn, flugfaligis ilin kelkpaŝe distance de la arbo. Dekstre kaj maldekstre, en la vitejoj, sur la vitbranĉoj ankoraŭ etenditaj, brilis folioj diversnuance ruĝaj; kaj la freŝe plugita tero kontrastis brune kaj reliefe en la kampoj de stoploj³ blankeskaj kaj briletaj pro l' densa roso. La scenejo estis gaja: sed ĉiu aperanta homa figuro malĝojigis rigardon kaj penson. De tempo al tempo oni renkontis ĉifonajn kaj mincajn almozistojn, aŭ maljuniĝintajn en tiu metio, aŭ ĵus devigitajn de la bezono etendi almospete la manon. Ili silente pasis apud patro Cristoforo, lin rigardis kompatinde, kaj kvankam ili nenion povus esperi de li, ĉar tiuepoke kapuceno neniam tuŝis moneron, tamen ili faris al li dankespriman sinklinon, pro la almozo, kiun ili en la monakejo aŭ jam ricevis aŭ iros peti. Eĉ

¹ *festonitaj*: ornamitaj duon-girland-forme

² *trameloj*: kunaĵo de fiŝretoj kun divers-dimensiaj maŝoj.

³ *stoploj*: duon-trunketoj de tritiko plu-starantaj surkampe post falĉado.

pli ĉagrena estis la spektaklo de la laboruloj disaj en la kampoj. Unuj siajn semojn disĵetis maldense, ŝpareme, kaj kontraŭvole, kvazaŭ riskante ion tro ŝatatan; aliaj iel pene enpuŝis la ŝpaton en la grundon, kaj senfervore renversis la terbulojn. Minca knabino paŝtis bovineton ĝis-oste malgrasan, tenante ĝin per ŝnuro, kaj atente rigardis antaŭ la bruto, por rapide kliniĝi kaj forŝteli kiel nutraĵon al sia familio iun herbon, pri kiu la malsato al ŝi instruis, ke el ĝi ankaŭ homoj povas vivteni sin. Tiuj ĉi spektakloj ĉiupaŝe pliigis la malĝojon de la frato, kiu marŝis kun malĝoja antaŭsento, ke li iras aŭskulti malfeliĉon.

– Sed kial li estis tiel zorgoplena por Lucia? Kaj kial, ĉe l' unua averto, li ekiris tiel urĝe, kiel ĉe voko de la provincialo? Kaj kiu do estis tiu ĉi patro Cristoforo? – Necesas kontentigi ĉiujn ĉi demandojn.

Patro Cristoforo el *** estis viro pli proksima al sesdek ol al kvindek vivo-jaroj. Lia kapo, razita, escepte de eta har-krono, kiu ĝin ĉirkaŭis laŭ la kapucena rito, leviĝis de tempo al tempo per ekmovo, kiu montris ion superecan kaj malkvietan; kaj tuj ĝi kliniĝis pro humileca pripenso. La blanka longa barbo, kiu al li kovris vangojn kaj mentonon, eĉ pli multe reliefigis la formojn de la supra vizaĝ-parto, al kiuj la delonge kutima abstinado plimulte aldonis da digno ol deprenis da esprimivo. La du kavaj okuloj estis plejofte mallevitaj al-tere, sed foje ili fajreris kun subita vigleco; kvazaŭ du bizaraj ĉevaloj man-kondukataj de koĉero, kontraŭ kiu ili sperte scias, ke neblas elvenki, kaj tamen de tempo al tempo ili faras salt-paŝon, kiun ili tuj devas punpagi per energia mordaĵ-tiro.

Patro Cristoforo ne ĉiam estintis tia, nek ĉiam estis

Cristoforo: lia bapto-nomo estis Lodovico. Li estis filo de komercisto el *** (ĉiuj ĉi asteriskoj devenas de la singardemo de mia anonimulo), kiu en siaj lastaj vivo-jaroj, konstatinte ke li estas tre provizita per riĉaĵoj, kaj li havas tiun ununuran filon, resignis komercadon kaj sin donis al senjoreca vivo-maniero.

En lia nova mallaboro, lin ekregis granda honto pri la tempo pasigita laborante en tiu ĉi mondo. Regate de tia fantaziaĵo, ĉiajn rimedojn li serĉis, por forgesigi, ke pasintece li estis komercisto: li mem volus tion forgesi. Sed la magazeno, la var-pakaĵoj, la konto-libro, la ulno⁴, senĉese reaperis al lia memoro, kiel la ombro de Banco al Macbeth⁵, eĉ inter la pompo de l' festenoj kaj la rideto de l' parazitroj. Kaj ne estas direble, kiom tiuj ĉi kompatinduloj devis zorgegi, por eviti ĉian vorton, kiu povus aspekti aluda pri l' iama profesio de la invitinto. Iun tagon – por menci i unu kazon – iun tagon, ĉe l' fino de bankedo, en momentoj de plej vigla kaj senĝena gajeco, tiel ke ne eblus diri, ĉu plimulte plezuriĝis la gastaro detabligante aŭ la mastro surtabliginte, ĉi lasta kun amikeca supereco pik-mokis unu el la tablanoj, la plej senkulpan manĝanton en la mondo. La homo, nur por rebati la ŝercon, tute senmalice, kun plej infaneca naivo, respondis proverbe: «Surdas mi je la insisto – laŭ kutim' de komercisto». Lin mem tuj ŝokis la sono de l' vorto elirinta el lia buŝo: li ekrigardis kun malcerta mieno la mienon de l' mastro, kiu jam malsereniĝis: ambaŭ volis reakiri la antaŭan aspekton; sed estis neeble. Ĉiu el la ceteraj tablanoj cerbumis, kiel likvidi la

⁴ *ulno*: malnova mezurunuo de longo.

⁵ *Macbeth*: ĉefrolulo de ŝekspira dramverko, kiu ade vidas reaperi Bancon, de li murditan.

etan skandalon kaj deturni la atenton, sed, dum cerbumo, ĉiu silentis, kaj en tiu silento la skandalo pli evidentiĝis. Ĉiu evitis renkonti la rigardon de la aliaj; ĉiu sentis, ke ĉiujn okupas la penso, kiun ĉiuj volas kaŝi. La ĝojo tiutage malaperis; kaj la malprudenta, aŭ pli ĝuste, la malfeliĉa homo, ne plu ricevis inviton. Tiel la patro de Lodovico travivis siajn lastajn jarojn en senĉesaj zorgoj, daŭre timante primokojn, kaj li neniam konsideris, ke vendi ne estas pli ridinde ol aĉeti, kaj ke la profesion, pri kiu li tiam hontis, li estis praktikinta publike kaj senrimorse dum multe da jaroj. Li edukigis la filon senjorece, laŭ la epokaj kondiĉoj, kaj kiel al li permesis leĝoj kaj moroj; li disponigis al li majstrojn pri beletroj kaj pri kavaliraj trejnoj; kaj li mortis, postlasante lin riĉa kaj tute juna.

Lodovico akiris senjorecajn morojn; kaj la flatemuloj, inter kiuj li kreskis, lin kutimigis esti traktata kun granda respekto. Sed kiam li volis aliĝi al la altranguloj de sia urbo, li trovis agmanieron tute malsaman ol tiu, al kiu li estis kutima; kaj li vidis ke, por aparteni al tiu anaro, kiel li deziris, li bezonas novan kurson de pacienco kaj submetiĝo, ĉiam resti sube, kaj glutaĉi ĉiumomente maldolĉajn buŝplenojn. Tio kongruis nek kun la edukiĝo nek kun la temperamento de Lodovico. Iritite, li sin apartigis de ili. Sed li restis for kun bedaŭro; ĉar ŝajnis al li, ke ĝuste tiuj devus esti liaj kunuloj; tamen li volis ilin pli alireblaj. Ĉe tia miksaĵo de inklino kaj rankoro, ĉar li ne povis ilin frekventi familiare, kaj tamen deziris iel rilati kun ili, li komencis konkuri kun ili per pompoj kaj grandiozaĵoj, kaj tiel li aĉetis kontraŭ mono malamikecojn, enviojn kaj ridindecon. Krome lia temperamento, samtempe honesta kaj perforta, lin baldaŭ enlogis en aliajn pli seriozajn konkurojn. Li sentis spontanen kaj sinceran abomenon kontraŭ

supertrudoj kaj perfortoĵoj, abomenon, kiun pliakrigis la rango de la personoj, kiuj ĉiutage plejmulte faris tiaĵojn: ĝuste tiuj, kontraŭ kiuj li plejmulte rankoris. Por samtempe kontentigi aŭ praktiki ĉiujn ĉi-pasiojn, li volonte partianiĝis por subpremata senfortulo, taksis kiel puntilion haltigi arogantulon, enmiksiĝis en unu kverelon, surprenis alian; tiel ke iom post iom li fariĝis kvazaŭ protektanto de subprematoj, kaj venĝanto de maljustaĵoj. La tasko estis peza; kaj superfluas demandi, ĉu Lodovico havis malamikojn, penojn, kaj zorgojn. Krom la ekstera batalado, lin daŭre turmentis ankaŭ internaj konfliktoj; ĉar, por venki (se ne menciis la malvenkojn), li mem devis apliki trompojn kaj perfortoĵojn, kiujn pli poste lia konscienco ne povis aprobi. Li devis teni ĉirkaŭ sikonsiderindan kvanton da bravulaĉoj; kaj, ĉu por sia sekureco, ĉu por ricevi pli fortan helpon, li devis elekti la plej riskemajn, tio estas la plej kanajlajn; kaj vivi kun kanajloj pro amo al justeco. Tiel ke pli ol unufoje, aŭ deprimite post malsukceso, aŭ maltrankvila pro aktuala danĝero, aŭ tedite pro l' senĉesa singardado, aŭ naŭzite de sia kunularo, zorgoplena pri la estonteco, pri la riĉaĵoj, kiujn tagon post tago li forspezis en bonfaroj kaj bravaĵoj, li fantaziis fariĝi monako; kio estis tiuepoke plej kutima rimedo por elturniĝi el implikoj. Sed tio, kio eble restus nur fantaziaĵo dum lia tuta vivo, fariĝis decido kaŭze de akcidento, la plej grava, kiu iam ajn lin trafis.

Iun tagon li marŝis tra strato de sia urbo, sekvate de du bravuloj, kaj akompanate de iu Cristoforo, lia iama butika knabo, kaj, post fermo de la butikoj, ĉef-servisto en lia domo. Temis pri viro ĉirkaŭ kvindekjara, sindona ek de sia junaĝo al Lodovico, kiun li konis ek de lia naskiĝo, kaj kiu al li havigis, per salajro kaj donacoj, ne nur sufiĉe por vivi, sed ankaŭ por

vivteni kaj kreskigi sian multmembran familion. De malproksime Lodovico vidis aperi senjoron Tia-Tia, profesion arogantulon kaj trudulon, kun kiu li dumvive neniam estis parolinta, sed kiu al li estis elkore malamika; kion same elkore tiu reciprokis: ĉar apartenas al la privilegioj de ĉi-mondo la ebleco malami kaj malamiĝi, eĉ se oni ne sin konas reciproke. Tia ulo, sekvate de kvar bravuloj, antaŭeniris rekte, kun orgojla paŝado, kun levita kapo, kun buŝo afektanta superecon kaj malŝaton. Ambaŭ marŝis tuŝe al la muro; sed Lodovico (notu bone!) ĝin tuŝis per la dekstra flanko; kaj tio, laŭ iu moro, donis al li la rajton (kien do enŝoviĝas rajto!) ne disiĝi de la menciita muro, por cedi prioritaton al iu ajn; afero kiun oni tiuepoke ege konsideris. La alia male pretendis, ke tiu rajto apartenas al li, kiel nobelo, kaj ke Lodovico devas iri en la strat-mezon; kaj tio surbaze de alia moro. Ĉar, pri tiu ĉi afero, kiel pri multe da aliaj, validis du kontraŭaj moroj, kaj ne estis decidite, kiu el ili pravas; tiu ĉi afero estigis la oportunon interbatiĝi, ĉiufoje kiam malmola kapo trafis en alian same harditan. Ambaŭ venis, unu renkonte al la alia, alpremite al la muro, kvazaŭ du marŝantaj bareliefoj.⁶ Kiam ili troviĝis vizaĝ-al-vizaĝe, senjoro Tia-Tia, rigardegante Lodovicon kun levita kapo, kun ordonema okulo, diris al li kun kongrua voĉtono: «cedu lokon».

«Vi mem cedu ĝin», respondis Lodovico. «La rekta apartenas al mi».

«Kun viaj ranguloj, ĝi ĉiam apartenas al mi».

«Jes, se l' aroganteco de viaj samranguloj estus leĝo por ranguloj miaj». La bravuloj de ambaŭ kverelantoj restis senmovaj, ĉiu malantaŭ sia mastro, rigardegante sin minace,

⁶ *bareliefoj*: plastikaj figuroj duon-elstaraj el la fono.

kun la manoj ĉe la glavoj, pretaj por batalo. La homamaso alvenanta de ambaŭ flankoj sin detenis distanca, por observi la okazaĵon; kaj la ĉeesto de tiuj spektantoj pli kaj pli ekscitis la puntilion de l' kverelantoj.

«En la mezon, ci malnobla metiisto, aŭ fine mi instruos cin, kiel trakti kun nobeloj».

«Vi mensogas, ke mi estas malnobla».

«Ci mensogas ke mi mensogis». Tiu ĉi respondo estis laŭrita. «Kaj se ci estus kavaliro, kia estas mi mem», aldonis tiu senjoro, «mi volus al ci pruvi, per kavaliraj glavo kaj mantelo, ke la mensogulo estas ci».

«Ĝi estas ja preteksto, por ne pruvi per faro la insolentecon de via diro».

«Ĵetu en la koton tiun ĉi kanajlon», diris la senjoro direkte al siaj anoj.

«Ni vidu!» diris Lodovico, kun subita retropaŝo, kaj kaptante la glavon.

«Temerara!» kriis la alia, elŝovante la sian: «mi rompos ĝin, kiam ĝi estos makulita per via malnobla sango».

Tiel ili sturmis unu la alian; la servistoj de la du partioj sin ĵetis defende de siaj mastroj. La batalo estis malegala, ĉu laŭ nombro de batalantoj, ĉu pro tio ke Lodovico celis eviti vundiĝojn kaj senarmigi la malamikon, prefere ol mortigi lin; sed ĉi-lastata tute volis lian morton. Lodovico jam ricevis de bravulo ponardo-pikon je la dekstra brako, kaj supraĵan strekvundon je unu vango, kaj la ĉefa malamiko sturmis, por finmortigi lin; kiam Cristoforo vidis sian mastron en mortodanĝero, li direktis la ponardon kontraŭ la nobelon. Ĉi-lastata, kontraŭ lin turnante sian tutan koleron, trapikis lin per la glavo. Ĉe tia vido, Lodovico, kvazaŭ freneza, enpikis la sian

en la ventron de la vundinto, kiu falis mortante, preskaŭ samtempe kun la povra Cristoforo. La bravuloj de la nobelo, kiam ili vidis ke estas likvidite,⁷ forkuris aĉe vundite: tiuj de Lodovico, ankaŭ ili mem draŝitaj kaj strekvunditaj, restinte sen kontraŭuloj, forŝteliĝis aliflanken, por ne implikiĝi en la amasiĝanta popolo: kaj Lodovico troviĝis sola, kun tiuj du funebraj kunuloj ĉe la piedoj, meze de popolamaso.

«Kio do rezultis? – Estas unu. – Estas du. – Li faris al li truon en la ventro. – Kiu estas murdita? – Tiu arogantulo. – Ho sankta Maria, kia frakaso! – Kiu serĉas, tiu trovas. – Per unu li elpagas ĉion. – Ankaŭ li mem likvidita. – Kia bato! – Riskas esti serioze. – Kio pri l' alia malfeliĉulo! – Kompaton! kia spektaklo! – Savu lin, savu lin. – Li ankaŭ ja estas aranĝita! – Vidu kiel li stataĉas! li eligas sangon ĉiuflanke. – Eskapu, eskapu. Ne lasu kapti vin».

Ĉi-lastaj vortoj, kiuj pli ol aliaj aŭdiĝis en la konfuza bruego de tiu popolamaso, esprimis la komunan deziron; kaj kun la konsilo venis ankaŭ la helpo. La afero estis okazinta apud kapucena preĝejo, tiuepoke azilo, kiel ĉiu scias, tute ne alirebla de ĝendarmoj kaj de tiu tuta kunaĵo de aferoj kaj personoj, kiu nomiĝis justico. La popolamaso tien kondukis aŭ portis la vunditan mortiginton, preskaŭ svenan; kaj la kapucenoj ricevis lin el la manoj de la popolo, kiu lin rekomendis, dirante: «li estas bonmora homo, kiu formortigis arogantan kanajlon: tion li faris por memdefendo, devigite kontraŭvole».

Lodovico neniam estis elverŝinta homan sangon; kaj, malgraŭ tio, ke murdo estis tiutempe tiel ordinara, ke ĉies oreloj kutimis pri ĝi aŭdi, kaj ĉies okuloj ĝin vidi, tamen la

⁷ *likvidite*: finite.

impreso, kiun li ricevis, vidante la homon mortintan pro li, kaj la mortigitan de li, estis tute nova kaj nedirebla; estis malkaŝo de ankoraŭ nekonataj sentoj. La falo de lia malamiko, la ŝanĝiĝo de tiu vizaĝo, kiu subite pasis de minaco kaj furiozo al subfalo kaj solena kvieto de morto, estis vidaĵo, kiu subite ŝanĝis la animon de la mortiginto. Trenite al la monakejo, li preskaŭ ne sciis, kie do li troviĝas, nek kion li faras; kiam li rekonsciis, li troviĝis en flegeja lito, sub la manoj de monako kirurgo (kapucenoj kutime havis unu tian en ĉiu monakejo), kiu aranĝis la gazojn kaj bandaĝojn⁸ sur la du vundoj ricevitaj en la konflikto. Unu pastro monako, kiu havis la specialan taskon asisti mortantojn, kaj kiu ofte devis plenumi tiun ĉi oficon surstrate, estis tuj venigita al la batal-loko. Post nemulte da minutoj li revenis, eniris en la flegejon, proksimiĝis al la lito, kie kuŝis Lodovico, kaj al li diris: «konsoliĝu, li almenaŭ mortis bonvirte, kaj li komisiis min, peti vian pardonon⁹ kaj transdoni al vi la lian». Tiu ĉi parolo tute rekonsciigis la povran Lodovicon, kaj revigligis pli vive kaj distinge la sentojn, kiuj konfuze kaj amase okupis lian animon: ĉagreno pro la amiko, konsterno kaj rimorso pro la kontraŭvola glavbato, kaj samtempe angor-plena kompatato por la viro de li mortigita. «Kaj kio pri la alia?», li angore demandis la kapucenon.

«La alia jam mortis, kiam mi alvenis». Intertempe la alirejojn kaj ĉirkaŭaĵojn de l' kapucenejo trasvarmis scivola popolo: sed alvenis ĝendarmaro, kiu dis-irigis la popolamason

⁸ *gazojn*: travideblajn tolojn; *bandaĝojn* bendojn, por ĉirkaŭvolvi kaj ŝirmi vundojn.

⁹ pardonon kaj pardonpeti estas grava kristana devo, ĉefe en mort-momento.

kaj posteniĝis iom distance de la pordego, tiel tamen, ke neniu povus eliri ne-vidate. Venis ankaŭ unu frato de la mortigito, du kuzoj kaj unu olda onklo, ĝisplande armitaj, kun granda akompano de bravuloj; kaj ili komencis tie patroli, rigardante kun mieno kaj gestoj de minaca incitiĝo tiujn scivolulojn, kiuj ne aŭdacis diri: meritite!, sed kvazaŭe portis tion skribita survizaĝe.

Lodovico, tuj kiam li sukcesis ordigi siajn pensojn, venigis monakon konfesprenanton, kaj lin petis serĉi la vidvinon de Cristoforo, kaj lianome pardonpeti ŝin, pro tio ke li mem kaŭzis, kvankam kontraŭvole, tiun ĉagrenegon, kaj samtempe certigi ŝin, ke li sin devigas vivteni ties familion. Poste, pripensante siajn okazaĵojn, li sentis pli vive kaj serioze ol iam ajn renaskiĝi la ideon pri monakiĝo, kiu jam alifoje trapasis lian menson: ŝajnis al li, ke Dio mem metis lin sur tiun vojon, kaj donis al li signon de sia volo, okazigante lian eniron en monakejon en tiu cirkonstanco; kaj li decidis. Li venigis la monakon-gardanton, kaj al li malkaŝis sian deziron. Tiu respondis, ke necesas sin gardi kontraŭ tro rapidaj decidoj; sed, se li persistas, li ne estas rifuzota. Tiam li venigis notarion kaj diktis akton de donacio de ĉio, kio al li restis (ĝi estis ankoraŭ rimarkinda havaĵo) por la familio de Cristoforo: monsumon al la vidvino, kvazaŭ kompensaĵon por ŝi, kaj la ceteron al la ok infanoj postlasitaj de Cristoforo.

La decido de Lodovico tre oportunis por liaj gastigantoj, kiuj estis pro li en aĉa implikaĵo. Lin resendi el la kapucenejo, kaj tiel elmeti lin al la justico, tio estas al la venĝo de l' malamikoj, estis solvo eĉ ne konsiderebla. Tio signifus rezigni siajn privilegiojn, senkreditigi la monakejon ĉe la popolo, altiri mallaŭdon el la tutmondaj kapucenoj per rompo de ilia

komuna rajto, inciti ĉiujn ekleziajn instancojn, kiuj konsideris sin gardantoj de tiu ĉi rajto. Aliflanke la familio de la mortigito, tre potenca per si mem kaj per siaj ligoj, estis rezoluta postuli venĝon; kaj deklaris malamiko ĉiun ajn, kiu provus ĝin malhelpi. La historio ne diras, ke ili tre multe bedaŭris la mortigiton, nek ke unu larmo estis verŝita pro li en la tuta parenaro: ĝi nur diras, ke ili ĉiuj furioze deziregis unge-kapti la murdinton, ĉu vivan, ĉu mortan. Nu, ĉi-lastata, per surmeto de kapucena robo, ĝustigus ĉiun aferon. Iamaniere li faros riparon, trudos al si pentofaron, implice¹⁰ deklaras sin kulpa, kaj retiriĝos de ĉia konkuro; entute li rolus kiel malamiko kiu delasas la armilojn. La parencoj de la mortinto povos, se tio al ili plaĉos, kredi kaj fanfaroni, ke li monakiĝis pro malespero kaj pro timo de ilia kolero. Ĉiamaniere, igi ke viro rezignu siajn havaĵojn, pritendu sian kapon, marŝu nuda-piede, dormu sur pajlo-matraco, vivu almozpete, povis aspekti kongrua puno, eĉ al plej vantema ofendito.

La monako-gardanto sin prezentis kun senĝena humileco al la frato de la mortinto, kaj, post mil proklamoj de respekto por la eminentega familio, kaj de deziro komplezegi ĝin en ĉio farebla, li parolis pri la pento de Lodovico kaj pri lia decido, takte sugestante, ke la familio ja povas per tio esti kontenta, kaj poste enŝovante, kun granda miel-dolĉeco kaj pli granda lerteco, la ideon ke, plaĉe-neplaĉe, tia devas esti la afero. La frato de la mortigito sin allasis al furiozo, kiun la kapuceno lasis disvaporigi, dirante de tempo al tempo: «tro prava doloro!». La ofendito komprenigis, ke ĉiuokaze lia familio kapablos havigi al si riparon: kaj la kapuceno, kion ajn pensante, ne respondis nee. Fine tiu postulis kaj trudis, kiel

¹⁰ *implice*: ne formale, sed subkompreneble.

kondiĉon, ke la mortiginto de lia frato tuj forlasu tiun urbon. La gardanto, kiu jam decidis fari tion, diris, ke tio okazos, kaj li lasis lin kredi, se tio al li plaĉas, ke ĝi estos pro obeo al li: kaj ĉio estis aranĝita. Kontentis la familio, kiu elturniĝis kun honoro; kontentis la kapucenoj, kiuj savis kaj homon kaj siajn privilegiojn, sen estigi malamikon; kontentis la diletantoj pri kavalirismo, kiuj vidis aferon finita en laŭdinda maniero; kontentis la popolo, kiu vidis ŝatatan homon malimplikita, kaj samtempe admiris lian konvertiĝon; fine, kaj pli ol ĉiuj, kontentis, en sia ĉagreno, nia Lodovico, kiu komencis vivon de pentofaro kaj servo, kiu povu, se ne ripari, almenaŭ kompensi la misfaron, kaj malakrigi la netolereblan rimorson. La suspekto, ke lian decidon oni taksos kaŭzita de timo, lin afliktis momente; sed tuj li sin konsolis per la penso, ke eĉ tiu mistakso estos por li puno kaj pentofarilo. Tiel li, tridekjaraĝa, sin vestis per sakaĵo; kaj kiam li devis, laŭ la monaka moro, forlasi sian nomon kaj alpreni novan, li elektis nomon, kiu ĉiumomente al li memorigu, kion li devas pentofari: kaj li sin nomis frato Cristoforo.

Tuj post la ceremonia surmeto de la orden-robo, la gardanto ordonis, ke li iru novicadi en ***, distanca sesdek mejlojn, kaj ke li ekvojaĝu la morgaŭan tagon. La novico kliniĝis profunde, kaj petis favoron. «Patro», li diris, «permesu, ke antaŭ ol forlasi ĉi tiun urbon, kie mi elverŝis homan sangon, kie mi lasas familion kruele ofendita, mi almenaŭ mildigu la ofendegon, mi almenaŭ esprimu mian bedaŭron ne povi ripari la damaĝon, pardon-petante la fraton de la mortigito, kaj, se Dio benas mian intencon, mi forigu la rankoron de lia animo». Al la gardanto ŝajnis ke tia elpaŝo, krom bona en si mem, estos utila, por pli kaj pli repacigi tiun

familion kun la kapucenejo; kaj senpere li iris al tiu senjoro frato, por al li prezenti la peton de frato Cristoforo. Ĉe tiel neatendita propono, tiu sentis, kune kun miro, denovan koleran eksciton, kiun tamen akompanis ia plezuro. Post momenta pripenso, «li venu morgaŭ», li diris; kaj li fiksis la horon. La gardanto revenis, portante al la novico la deziratan konsenton.

La nobelo tuj pensis, ke ju pli solena kaj brua estos tiu kompensaĵo, des pli kreskos lia prestiĝo ĉe la tuta parenaro kaj la publiko; kaj ĝi estos (se uzi modernan elegantaĵon) bela paĝo en la historio de la familio. Li rapide avizigis ĉiujn parencojn, ke morgaŭ tagmeze ili serviĝu (tiele oni kutimis diri tiutempe), venante al li, por ricevi komunan riparon. Je tagmezo, la palacon trasvarmis senjoroj el ĉiu aĝo kaj sekso: estis zigzagado kaj miksiĝo de mantelegoj, de altaj plumoj, de pendantaj spadegoj, osciloj de amelitaj kolumaj krispaĵoj, kunpuŝa trenado de longaj arabeske broditaj mantelaĵoj. La antaŭĉambrojn, la korton kaj la straton trasvarmis servistoj, paĝioj kaj scivoluloj. Frato Cristoforo vidis tiun aranĝaĵon, divenis ties kialon, kaj eksentis etan eksciton; sed post momento li diris al si mem: – ja estas meritite: mi lin mortigis publike, antaŭ multe da liaj malamikoj: tio estis skandalo, ĉi tio estas riparo. – Tiel, kun mallevitaj okuloj, akompanate de alia kapuceno, li trapasis la pordegon de tiu domo, transiris la korton, tra homamaso, kiu lin rigardegis kun senceremonia scivolo, li supreniris la ŝtuparon, kaj, meze de alia amaso da moŝtuloj, kiu spaliris lian trapason, sekvate de cent rigardoj, li alvenis antaŭ la mastro; kiu, ĉirkaŭate de plej proksimaj parencoj, aplombis meze de la salonego, kun la rigardo teren kaj la mentono supren, pugne tenante per la maldekstra mano

la glavo-tenilon, kaj per la dekstra prem-tenante surbruste la kolum-refaldon de la mantelo.

Foje la mieno kaj sinteno de homo tiel senpere esprimas lian internan animon, ke ĉe amaso da rigardantoj tio estigas unuaniman impreson. La vizaĝo kaj sinteno de frato Cristoforo esprimis klare al ĉiuj ĉeestantoj, ke li ne monakiĝis, nek venis al tiu humiliĝo pro homa timo: kaj tio estigis ĝeneralan korfavoron liarilate. Kiam li vidis la ofenditon, li plirapidigis la paŝojn, surgenuiĝis ĉe liaj piedoj, krucis la manojn surbruste, klinis la razitan kapon, li diris jenajn vortojn; «mi estas la murdisto de via frato. Dio scias, ĉu mi volus lin al vi redoni, eĉ koste de mia sango; sed ĉar mi povas nenion, krom prezenti senefikajn kaj malfruajn pardon-petojn, mi petegas vin akcepti ilin pro amo al Dio». Ĉies okuloj estis fiksaj super la novico, kaj super la alparolata moŝtulo; ĉies oreloj estis streĉitaj. Kiam frato Cristoforo eksilentis, tra la tuta salonego leviĝis murmuro de kompatato kaj respekto. La nobelo, kiu afektis kontraŭvolan deĝnon kaj bremsatan koleron, je tiuj vortoj skuiĝis, kaj, sin klinante al la surgenuinto, «leviĝu», li diris kun emociita voĉo: «la ofendo... la faro verdire... sed la robo, kiun vi surportas... ne nur ĝi, sed ankaŭ pro vi... Leviĝu, patro... Mi ne povas nei... ke mia frato... estis kavaliro... estis viro... iom impeta... iom vigla. Sed ĉio okazas pro Dia dispono. Oni ne plu parolu pri ĉi-afero. Sed, patro, vi ne devas resti en tia pozicio». Li kaptis lin je la brakoj kaj li levis lin. Frato Cristoforo, stare, sed kun mallevita kapo, respondis: «mi do rajtas esperi, ke vi al mi donis vian pardonon! Kaj se mi ricevas ĝin de vi, de kiu do mi ne rajtus ĝin esperi? Ho! se mi povus el via buŝo aŭdi ĉi tiun vorton: pardono!». «Ĉu pardono?» diris la nobelo. «Vi ne plu

bezonas ĝin. Kaj tamen, ĉar vi ĝin deziras, certe, certe, mi elkore vin pardonas, kaj ĉiuj...».

«Ĉiuj! ĉiuj!» kriis unuvoĉe la ĉeestantoj. La vizaĝo de la monako malfermiĝis al danko-plena ĝojo, sub kiu tamen ankoraŭ travidiĝis profunda kaj humila pento-sento pro la malbonfaro, kiun homa pardono ne povas ripari. La nobelo, venkite de tiu aspekto, kaj ravite de la ĝenerala kortuŝiĝo, sin ĵetis al kolo de l' kapuceno, kaj donis kaj ricevis paco-kison.

El ĉiuj flankoj de la salonego eksplodis krio: «brave! bone!»; ĉiuj ekiris kaj premiĝis ĉirkaŭ la religiulo. Intertempe alvenis servistoj kun granda abundo da regalaĵoj. La nobelo proksimiĝis al nia Cristoforo, kiu gestis ke li volas peti forpermeson, kaj al li diris: «patro, bonvolu akcepti ion; donu al mi ĉi tiun pruvon de amikeco». Kaj li komencis servi lin kiel unuan; sed li, retirante sin kun elkora rezistemo, «ĉi-aferoj», li diris, «ne plu taŭgas por mi; sed tute ne okazos, ke mi rifuzas viajn donacojn. Mi estas forvojaĝonta: bonvolu do ordoni, ke oni al mi portu unu panon, tiel ke mi povu diri, ke mi ĝuis vian karitaton, ke mi manĝis vian panon, ke mi ricevis signon de via pardono». La nobelo, kortuŝite, ordonis, ke oni tion faru; kaj tuj venis kelnero, pompe portante sur arĝenta telero unu panon, kaj li prezentis ĝin al la kapuceno, kiu prenis ĝin kaj dankis, kaj metis ĝin en sian man-korbon. Poste li petis forpermeson; kaj, brakuminte denove la mastron, kaj ĉiujn kiuj, estante al li proksimaj, sukcesis momente kapti lin, li pene liberigis sin de ili; li devis bataleti en la antaŭĉambro, por sin elturni el la servistoj kaj eĉ el la bravuloj, kiuj al li kisis la randon de la robo, la ŝnur-zonon, la kapuĉon, kaj li troviĝis sur la strato, kvazaŭ triumfe portate, kaj akompanate de popolamaso, ĝis la urba pordego, tra kiu li eliris, kaj tiel li

komencis sian piedvojaĝon, direkte al sia novicejo.

La frato de la mortigito, kaj la parencaro, kiuj esperis tragusti en tiu tago la tristan ĝojon de orgojlo, male troviĝis plenaj de la paca ĝojo de pardono kaj bonvolo. La societo tie restis ankoraŭ iom da tempo, kun nekutimaj mildeco kaj elkoreco, kaj pritraktis temojn, kiujn neniu atendis, irante tien. Anstataŭ eldevigitaj riparoj, venĝitaj trudaĵoj, plenumitaj puntilioj, la konversacio temis pri laŭdoj al la novico, pri repaciĝo kaj mildeco. Kaj iu, kiu kvindekan fojon rakontus, kiel grafo Muzio, lia patro, en tiu fama cirkonstanco, sukcesis trudi devon al markizo Stanislao, kiu estis tiu arogantegulo de ĉiuj konata, parolis anstataŭe pri la pentofaroj kaj mirinda pacienco de ia frato Simone, mortinta antaŭ multe da jaroj. Post foriro de la societo, la mastro, ankoraŭ tute kortuŝite, kun miro repensis ĉiujn vortojn de li aŭditajn kaj diritajn; kaj li grumblis inter-dente: – diabla frato! (ni ja devas transskribi liajn precizajn vortojn) – diabla frato! se li restus tie surgenue ankoraŭ kelkmomente, mi mem preskaŭ pardonpetus lin, ke li murdis mian fraton. – Nia historio malkaŝe notas, ke post tiu tago tiu senjoro estis iom malpli impeta, iom malpli moroza.

Patro Cristoforo marŝis, kun konsolo neniam sentita post tiu terura tago, por kies punpago li dediĉos sian tutan vivon. La silenton, devigan por la novicoj, li observis nekonscie, absorbite en la penso pri la penoj, la abstinoj kaj la humiliĝoj, kiujn li eltenos, por elpagi sian misfaron. Kiam li haltis en la nutro-horo ĉe bonfarulo, li manĝis kun speco de volupto el la pano de l' pardono: sed li gardis el ĝi pecon, kiun li remetis en sian korbeton, por ĝin teni kiel ĉiaman memoraĵon.

Ne estas nia intenco rakontadi la tutan historion de lia kapucena vivo: ni nur diros ke, ĉiam plenumante tre volonte

kaj tre diligente la taskojn ordinare al li komisiitajn, nome fari predikojn kaj asisti mortantojn, li neglektis nenian oportunon, por praktiki du kromajn, al kiuj li mem sin devigis: nome glatigi malkonkordojn kaj protekti subprematojn. En tiu inklino parte kaj nekonscie pludaŭris lia malnova kutimo, kaj restaĵeto el la batalema spirito, kiun la humiliĝoj kaj abstinencegoj ne tute sukcesis estingi. Kutime lia lingvaĵo estis humila kaj senekscita, sed se temi pri kontraŭataj justeco kaj vero, la viro subite vigliĝis per la iama impeto, kiu helpate kaj modifate de emfaza esprimmaniero, al li devenanta el la kutimo de predikado, donis al tiu lingvaĵo unikan karakteron. Lia tuta sinteno, kiel ankaŭ lia aspekto, malkaŝis longan bataladon inter fajra, incitiĝa temperamento, kaj kontraŭa volo, kutime venka, ĉiam viglanta kaj regata de noblaj motivoj kaj inspiroj. Iu kun-monako kaj amiko lia, kiu bone lin konis, iam komparis lin kun tiuj vortoj, tro esprimivaj en ties normala formo, kiujn eĉ bone edukitaj homoj, kulmine de pasio, eldiras, kripligitaj, kun kelka ŝanĝita litero; vortoj kiuj, eĉ tiel kamuflitaj, tamen memorigas sian originan energion.

Se nekonata malriĉulino, en ĉagrena kazo kiel tiu de Lucia, petus la helpon de patro Cristoforo, li tuj-tuj alkurus. Koncerne Lucian mem, des pli urĝe li alrapidis, pro tio ke li konis kaj admiris ŝian senkulpecon, kaj jam estis zorgoplena pro ŝiaj danĝeroj, kaj sentis sanktan indignon pro la fia persekutado, kiu ŝin trafis. Krom tio, ĉar li mem, por eviti pli grandan malbonon, konsilis ke ŝi nenion malkaŝu kaj restu kvieta, li nun timis ke lia konsilo kaŭzis bedaŭrindaĵon; kaj al la zorgoplena karitato, en li kvazaŭ kun-naskita, aldoniĝis ĉikaze la skrupulemo, kiu ofte turmentas bonvirtulojn.

Sed dum ni rakontis la travivaĵojn de patro Cristoforo, li

alvenis kaj prezentiĝis ĉe la dompordo; kaj la du virinoj lasis la tenilon de la haspelo, kiun ili turnadis kaj grincigis, ili leviĝis kaj diris unuvoĉe: «Ho patro Cristoforo! estu benata!».

Tiu ĉi patro Cristoforo starigis sin ĉe l' sojlo, ekrigardis la virinojn, kaj li tute komprenis, ke liaj antaŭsentoj ne estis falsaj. Tial, kun la demanda tono de l' homo, kiu atendas ĉagrenan respondon, levante la barbon per eta retromovo de l' kapo, li diris: «kio do?». Lucia respondis per plor-eksplodo. La patrino komencis pardonpeti, ke ŝi aŭdacis ĝeni... sed la frato eniris kaj, sidiĝinte sur tripieda benketo, ĉesigis la komplimentojn, kaj diris al Lucia: «kvietiĝu, povra filino. Kaj vi», li diris al Agnese, «al mi rakontu, kio do estas!». Dum la bona virino faris laŭpove sian ĉagrenan raporton, la vizaĝo de la frato ŝanĝiĝis je mil koloroj, kaj jen li levis la okulojn ĉielen, jen li batis teren la piedon. Kiam la rakonto finiĝis, li kovris al si la vizaĝon per la manoj, kaj elkriis: «ho benata Dio! ĝis kiam...!». Sed, ne fininte la frazon, li sin turnis denove al la virinoj kaj diris: «ho kompatindaj! Dio vizitis¹ vin. Povra Lucia!».

«Ĉu vi ne forlasos nin, patro?» diris ĉi-lastata, kun singultoj.

«Ĉu forlasi vin!» li respondis. «Kaj kun kia mieno mi aŭdacus ion peti je Dio por mi, se mi forlasus vin? vin, en ĉi tia stato! vin, kiun Li al mi konfidas! Ne deprimiĝu: Li asistos vin: Li ĉion vidas: Li povas eluzi eĉ sentaŭgan homon, kia mi estas, por konfuzi... Ni vidu, ni pensu, kio estas farebla».

Post tiuj vortoj, li apogis la maldekstran kubuton surgenuen, li klinis la frunton en la manplaton, kaj per la dekstra li kunpremis la barbon kaj la mentonon, kvazaŭ por teni ĉiujn anim-fakultojn kunaj kaj senmovaj. Sed pli atenta konsidero nenion efikis, krom evidentigi, kiom zorgiga kaj implika estas

¹ vizitis: Biblia dirmaniero = provis, aŭ permesis provon.

tiu kazo, kaj kiom malmultaj, malcertaj kaj danĝeraj estas ties solvoj. – Ĉu iom hontigi Don Abbondion, kaj lin konsciigi, kiom multe li malobservas sian pastran devon? Honto kaj devo neniom valoras por li, kiam li estas terurita. Ĉu teruri lin? Nu kiujn rimedojn mi havas, por estigi en li teruron pli grandan ol tiu, kiun li havas pri pafo? Ĉu informi pri ĉio la kardinalon ĉefepiskopon, kaj alvoki lian aŭtoritaton? Tio bezonas tempon: kaj kio dume? kaj kio poste? Eĉ se tiu povra senkulpulino edziniĝus, ĉu tio bremsus tiun viron? Kiu scias, ĝis kio li aŭdacus?... Ĉu al li rezisti? Kiel? Ha, se mi povus, pensis la povra frato, anigi al mia afero miajn kapucenojn de ĉi tie kaj en Milano! Sed ĝi ne estas komuna afero; oni lasus min sola. Tiu viro afektas sin amiko de l' kapucenejo, sin kredigas partiano de l' kapucenoj: kaj ĉu ne venis plurfoje liaj bravuloj azili ĉe ni? Mi estus sola en la afero; oni eĉ taksus min malkvieta, intrigema, kverelema; kaj, kio plej gravas, per maloportuna provo mi eĉ riskus pli-aĉigi la situacion de la povrulino. – Pritaksinte la por- kaj kontraŭ-argumentojn de l' diversaj solvoj, li pensis ke estos plejbone alfronti Don Rodrigon mem, klopodi lin deturni de lia fi-intenco, per petoj, per teruroj de la transmonda, kaj laŭeble de la ĉi-monda vivo. En plej aĉa kazo, oni per tio almenaŭ povos ekkoni pli klare, kiagrade tiu viro obstinas ĉe sia fi-klopodo, plimulte malkovri liajn intencojn, kaj el tio konsiliĝi.

Dum la frato tiel meditadis, Renzo, kiu, pro la kialoj, kiujn ĉiu povas diveni, ne scipovis resti for de tiu hejmo, aperis ĉe l' pordo; sed, kiam li vidis la patron enpena, kaj la virinojn gestantaj ne ĝeni lin, li haltis ĉe la sojlo, silente. Levinte la vizaĝon, por komuniki al la virinoj sian planon, la frato ekvidis lin, kaj lin salutis en maniero, kiu esprimis la

kutiman am-senton pli intensigitan de kompato.

«Ĉu oni al vi diris..., patro?» demandis lin Renzo, kun emociita voĉo.

«Jes, bedaŭrinde; kaj pro tio mi estas ĉi tie».

«Kion vi diras pri tiu kanajlo...?». «Kion mi diru pri li? Li ne estas ĉi tie, por aŭskulti: kion efikus miaj vortoj? Al vi, mia Renzo, mi diras, ke vi fidu je Dio, kaj ke Dio ne forlasos vin».

«Benatas viaj vortoj!» elkriis la junulo. «Vi ne apartenas al tiuj, kiuj ĉiam malpravigas malriĉulojn. Sed sinjoro parokestro kaj tiu sinjoro doktoro pri malgajnaj juĝaferoj...».

«Ne reelfosu tion, kio nenion efikus, krom eksciti vin senutile. Mi estas povra frato; sed al vi mi ripetas tion, kion mi diris al ĉi-virinoj: laŭ mia modesta povo, mi tute ne forlasos vin».

«Ho, vi ne estas kiel la amikoj en la mondo! Klaĉuloj! Kiu kredus al la deklaregoj, kiujn ili al mi faris en la feliĉa tempo; he, he! Ili pretus eĉ oferi l' sangon por mi; eĉ kontraŭ la diablo ili defendus min. Kio, se mi havus malamikon?... sufiĉus, ke mi tion komprenigu; tia homo baldaŭ ĉesus manĝi panon. Kaj nun, se vi vidus, kiel ili retiriĝas...». Ĉe tio, levante la okulojn al la vizaĝo de la patro, li vidis ke ĝi tute malsereniĝis, kaj li komprenis, ke li diris ion malkonvenan. Sed, por ĝustigi ĝin, li konfuziĝis kaj implikiĝis: «mi volis diri... mi ne intencas diri... tio estas, mi volis diri...».

«Kion vi volis diri? Kio do? Vi do komencis fuŝi mian agon, jam antaŭ ol mi ĝin entreprenus! Bonŝance al vi, ke vi seniluziiĝis ĝustatempe. Kio do! vi serĉis amikojn... kiajn amikojn!... kiuj ne povus helpi vin, eĉ se ili volus! Kaj vi provis perdi Tiun solan, kiu tion kaj povas kaj volas! Ĉu vi ne scias, ke Dio estas amiko de l' afliktitoj, kiuj fidus al Li? Ĉu vi

ne scias ke senfortulo, eligante la ungojn, tute ne gajnas? Kaj eĉ se jes...». Ĉe tio li kaptis energie la brakon de Renzo: lia aspekto, sen perdi aŭtoritatecon, mieniĝis al solena pentosento, la okuloj malleviĝis, la voĉo fariĝis lanta kaj obtuza: «eĉ se jes... ĝi estus terura gajno! Renzo! ĉu vi volas fidi min?... sed kial mi diras min, kiu estas kompatinda hometo, frateto? Ĉu vi volas fidi Dion?». «Ho jes!» respondis Renzo: «Li vere estas la Sinjoro».

«Nu; promesu, ke neniun vi alfrontos, ke neniun vi provokos, ke vi lasos vin gvidi de mi».

«Mi promesas».

Lucia eligis grandan spiron, kvazaŭ estus de ŝi levita granda pezaĵo; kaj Agnese diris: «brave, fileto».

«Aŭskultu, filetoj», reparolis frato Cristoforo: «hodiaŭ mi iros paroli al tiu viro. Se Dio tuŝos lian koron, kaj donos forton al miaj vortoj, bone: se ne, Li mem al ni trovigos alian rimedon. Dume vi restu kvietaj hejme, evitu babilojn, ne elmontru vin. Ĉi-vespere, aŭ maksimume morgaŭ matene, vi revidos min». Post tiuj vortoj, li ĉesigis ĉiujn dankesprimojn kaj benojn, kaj ekiris. Li direktis sin al la monakejo, kiun li atingis ĝustatempe, por iri en la ĥorejon kaj ĉanti sekston², li tagmanĝis, kaj tuj li survojiĝis al la kuŝejo de l' bestego, kiun li provos malsovaĝigi.

La palaco de Don Rodrigo elstaris izola, simile al fortikaĵo, sur kulmino de unu el la altaĵoj, kiuj dise reliefigas tiun lago-bordon. Al tiu ĉi indiko la anonimulo aldonas, ke la loko (preferindus, ke li simple skribu ties nomon) estis pli supra ol la vilaĝeto de la gefianĉoj, distance de ĝi eble tri mejlojn, kaj kvar de la monakejo. Baze de la altaĵo, je l'

² *ĉanti sekston*: kanti tagmezan preĝon.

flanko turnita al la sudo kaj al la lago, staris amaseto da domaĉoj, loĝataj de l' kampuloj de Don Rodrigo; kaj ĝi estis kvazaŭ la eta ĉefurbo de lia eta regno. Sufiĉis trairi ĝin, por ricevi klaran ideon pri la situacio kaj la moroj de la vilaĝo. En la teretaĝaj ĉambroj, kies pordoj estis eventuale malfermitaj, videblis, kroĉitaj al la vandoj, pafiloj, blunderbuzoj³, pioĉoj, rastiloj,⁴ pajlaj ĉapeloj, retaĵetoj, kaj pulvo-flasketoj, ĉio malorde. La renkontataj homoj estis dik-trunkaj kaj morozaj viraĉoj kun granda hartufo renversita malantaŭen kaj enfermita en retaĵo; oldulaĉoj kiuj, perdinte la dentegojn, ŝajnis daŭre pretaj, ĉe plej eta incito, minac-montri la gingivojn; virinoj kun virecaj vizaĝoj, kaj kun brakoj muskolaj kaj taŭgaj helpi al la lango, se ĉi-lastata ne sufiĉus: eĉ en la aspektoj kaj movoj de la infanoj ludantaj surstrate vidiĝis io spitema kaj provoka.

Frato Cristoforo transiris la vilaĝon, supreniris tra helikforma pado, kaj atingis etan esplanadon antaŭ la palaco. La pordego estis fermita: signo ke la mastro estas tagmanĝanta, kaj ne volas esti ĝenata. La nemultaj fenestretoj turnitaj al la strato, fermitaj per ŝutroj nekoheraj kaj konsumitaj pro la jaroj, estis ŝirmataj per dikaj ferkradoj, kaj la teretaĝaj estis tiom altaj, ke apenaŭ ilin atingus unu viro surŝultre de alia. Granda silento regis tie; kaj eventuala pasanto kredus, ke temas pri senhoma domo, se kvar kreaĵoj, du vivaj kaj du mortaj, simetrie dismetitaj ekstere, ne indicus pri enloĝantoj. Du grandaj vulturoj⁵, kun la flugiloj etenditaj kaj la kranioj suben, unu preskaŭ senpluma kaj duon-erodita

³ *blunderbuzoj*: iamaj pafiloj kun funelforma buŝo.

⁴ *pioĉoj, rastiloj*: agrikulturaj laboriloj.

⁵ *vulturoj* estas rabobirdoj.

per la tempo, la alia ankoraŭ solida kaj plumhava, estis alnajlitaj al ĉiu el la du pordo-klapoj; kaj du bravuloj, kuŝantaj po unu sur la du benkoj starigitaj ambaŭflanke, gardostaris, atende ke oni ilin vokos ĝui la restaĵojn el la manĝotablo de la mastro. La patro ekhaltis, kun sinteno de l' homo, kiu intencas atendi; sed unu el la bravuloj leviĝis, kaj al li diris: «patro, patro, eniru senĝene: ĉi tie oni ne atendigas kapucenojn: ni estas amikoj de la monakejo: kaj tie mi ekloĝis en momentoj, kiam ekstere estis aero ne tute spirebla por mi; kaj se oni al mi tenus la pordon fermita, la afero irus malglate». Tion dirante, li batis dufoje per la pordo-fracpilo. Ĉe tiu sono, de interne tuj respondis hurloj kaj jelpoj de dogoj⁶ kaj hundidoj; kaj post kelke da minutoj alvenis maljuna servisto, grumblante; sed vidinte la patron, li faris al li grandan sinklinon, li kvietigis la bestojn per la manoj kaj la voĉo, enkondukis la gaston en stretan korton, kaj refermis la pordon. Akompaninte lin en saloneton, li rigardis lin kun mieno plena de miro kaj respekto, kaj diris: «ĉu vi ne estas... patro Cristoforo el Pescarenico? ». «Ĝuste tio».

«Ĉu vi ĉi tie?».

«Kiel vi vidas, ho mia bonulo».

«Ĝi estos por bonfari. Bonon», li daŭrigis murmurante interdente, dum li plu iris, «oni povas fari ĉiuloke». Transirinte aliajn du aŭ tri malhelajn salonetojn, ili atingis la pordon de la bankedejo. Ĉi tie konfuza bruego de forkoj, de tranĉiloj, de glasoj, de teleroj, kaj super ĉio de misagordaj voĉoj, strebantaj superi unu la alian. La frato volis retiriĝi, kaj malantaŭ la pordo li bataletis kun la servisto, por resti sola en

⁶ hurloj kaj jelpoj de dogoj kaj...: laŭtaj blekoj kaj akraj krioj de grandaj hundoj kaj...

anguleto de la domo, atende ke la manĝo finiĝos, kiam la pordo malfermiĝis. Iu grafo Attilio, kiu sidis fronte (li estis kuzo de la mastro; kaj ni jam lin menciis, sen nomi lin), vidis razitan kapon kaj kapucenan robon, kaj rimarkis la modestan intencon de la bona frato; tiam: «he, he», li kriis: «ne forkuru de ni, respektata patro: eniru, eniru». Don Rodrigo, kvankam ne divenante precize la temon de tiu vizito, tamen, pro ia konfuza antaŭsento, volonte evitus ĝin. Sed, ĉar la ventkapa Attilio jam faris tiun grandan vokon, al li ne konvenis retiriĝi; kaj li diris: «venu, patro, venu». La patro eniris, sin klinis al la mastro, kaj respondis du-mane la salutojn de la tabloj.

Fronte al malvirtulo, ĝenerale plaĉas (mi ne diras: plaĉas al ĉiuj) imagi bonvirtan homon kun alta frunto, sekura rigardo, levita brusto, facilmovi lango. Fakte tamen, tio bezonas multe da cirkonstancoj, kiuj tre malofte troviĝas kune. Tial vi ne miru, se frato Cristoforo, malgraŭ la bona atesto de sia konscienco, la firmega sento pri la justeco de la afero, kiun li venis pledi, kaj la miksaĵo de abomeno kaj kompatato por Don Rodrigo, staris tamen kun esprimo de submetiĝo kaj respekto fronte al tiu Don Rodrigo mem, kiu sidis je l' tabla ĉef-loko en sia hejmo, en sia regno, ĉirkaŭita de amikoj, de omaĝoj, de tiom da signoj de potenco, kun mieno tia, ke ĝi mutigus ĉian homan peton: des pli konsilon, des pli korekton, des pli riproĉon. Li dekstre sidis tiu grafo Attilio, lia kuzo kaj, se necesas tion diri, lia kompano de diboĉoj kaj perfortoj, veninta de Milano, por kamparumi dum kelke da tagoj kune kun li. Maldekstre, ĉe alia flanko de la tablo, sidis, kun respekto granda, sed mildigita de sekureco kaj saĝumeco, sinjoro komunumestro: tiu sama, al kiu teorie apartenus la tasko fari justecon por Renzo Tramaglino kaj devigi Don Rodrigon

plenumi sian devon, kiel oni vidis supre. Fronte al la komunumestro, en teniĝo de plej pura, plej elkora respekto, sidis nia doktoro Impliktrafulo, en nigra parada mantelo, kaj kun la nazo pli ruĝeska ol kutime; fronte al la du kuzoj, du nekonataj tablanoj, pri kiuj nia historio nur diras, ke ili nenion faris, krom manĝi, kap-klini, rideti kaj aprobi ĉion ajn, kion ajna tablano diris, kaj neniu alia kontraŭdiris.

«Unu seĝon por la patro!» ordonis Don Rodrigo. Servisto prezentis seĝon, sur kiu patro Cristoforo sidiĝis, kun pardonpetoj al la senjoro, ke li venis en maloportuna horo. «Mi dezirus paroli tute sola al vi, kiam al vi estos komforte, pri grava afero», li aldonis pli mallaŭte ĉe l' orelo de Don Rodrigo.

«Bone, bone, ni parolos»; li respondis: «sed dume oni portu por drinki al la patro».

La patro provis tion eviti; sed Don Rodrigo, laŭtigante la voĉon en la denova bruado, kriis: «ne, diable, vi al mi ne faros tiun ĉi ofendon; neniam okazos, ke kapuceno foriros de tiu ĉi domo, ne gustuminte mian vinon, aŭ insolenta kreditoro, ne tragustinte la lignaĵojn de miaj arbaroj». Tiuj ĉi vortoj ekscitis ĝeneralan ridon, kaj interrompetis la debaton, kiu varme agitiĝis inter la tablanoj. Servisto portis sur pladeto kruĉeton da vino kaj longan kalik-forman glason, kaj prezentis ĝin al la patro, kiu, ne volante rezisti al tiel prema invito de tiu viro, kiun li deziregis igi bonvola, ne hezitis englasigi la vinon, kaj komencis ĝin gluteti malrapide.

«La citaĵo de Tasso⁷ tute ne pruvas vian aserton, respektata sinjoro komunumestro; ĝi eĉ estas kontraŭ vi»;

⁷ Tasso: itala poeto (1493-1569), kies verkoj estis atestimataj kiel modeloj de kavalirismo.

rekomencis kriegi grafo Attilio: «ĉar tiu erudiciulo, tiu grandulo, kiu parkeris ĉiujn regulojn de kavalirismo, skribas ke la sendito de Argante petis rajtigon de la pia Buglione, antaŭ ol prezenti la defion al la kristanaj kavaliroj...».

«Sed tio» rebatis la komunumestro, ne malpli kriegante, «estas flankajo, nur flankajo, poezia ornamaĵo, ĉar mesaĝisto estas esence netuŝebla, laŭ la juro de la gentoj, *jure gentium*⁸: kaj, sen multe da esploro, tion diras eĉ proverbo: ambasador' neniam kulpas. Kaj la proverboj, sinjoro grafo, estas saĝo de l' hom-raso. Kaj, ĉar la mesaĝisto nenion diris sianome, sed nur prezentis skriban defion...».

«Sed kiam do vi volos kompreni, ke tiu heroldo estis temerara azeno, kiu eĉ ne konis la unuajn...».

«Kun afabla permeso de viaj moŝtoj», interrompis Don Rodrigo, kiu ne ŝatis pliakriĝon de la diskuto: «ni apelaciu al patro Cristoforo; kaj oni akceptu lian verdikton».

«Bone, bonege», diris grafo Attilio, al kiu ŝajnis tre fajna afero, ke pri kavalirisma demando decidu kapuceno; dum la komunumestro, plej arde fervora ĉe la diskuto, apenaŭ kvietiĝis, kun mieno kvazaŭ li dirus: knabaĵoj!

«Sed laŭ mia kompreno», diris la patro, «ne temas pri aferoj, pri kiuj mi devus kompetenti.»

«Kutimaj monakaj pretekstoj de modesteco»; diris Don Rodrigo: «sed vi ne eskapos. He nu! ni ja scias ke vi ne venis en la mondon kun kapucena kapuĉo surkape, kaj la mondumon vi ja spertis. Nu, nu: jen la demando».

«La afero estas jena», komencis krei grafo Attilio.

«Lasu, ke parolu mi, kiu estas neŭtrala, kuzo», reparolis Don Rodrigo. «Jen la fakto. Hispana kavaliro sendas defion al

⁸ *jure gentium*, latine = internacia juro.

Milana kavaliro: la defi-portanto, ne trovinte hejme la defiaton, liveras la karton al frato de la kavaliro; tiu frato legas la defion, kaj responde donas al la mesaĝanto kelke da bastonbatoj. Temas...».

«Prave donitaj, prave aplikitaj», ekkriis grafo Attilio. «Estis vera inspiro...».

«...De la diablo», aldonis la komunumestro. «Bati ambasadoron! Sanktan personon! Ankaŭ vi mem, patro, diros al mi, ĉu ĝi estas kavalireca faro».

«Jes, sinjoro: kavalireca», kriis la grafo: «kaj lasu, ke tion diru mi, kiu nepre kompetentas, pri kio konvenas al kavaliro. Ho, se temus pri pugnoj, estus alia afero; sed bastono nenies manojn malpurigas. Sed jenon mi tute ne komprenas: kial do la ŝultroj de aĉulo vin zorgigas?».

«Kiu al vi parolis pri ŝultroj, mia sinjoro grafo? Vi al mi atribuas fuŝaĵojn, kiuj neniam trapasis mian kapon. Mi parolis pri karaktero, ne pri ŝultroj. Super ĉio mi parolas pri intergenta juro. Bonvolu diri al mi, ĉu la *fecialoj*⁹, kiujn la antikvaj Romanoj sendis proklami defiojn al la aliaj popoloj, petis rajtigon prezenti la heroldaĵon: kaj al mi trovu almenaŭ unu verkiston, kiu menciis, ke unu *fecialo* ricevis bastonbatojn».

«Kial do koncernus nin la oficiroj de l' antikvaj Romanoj? Homoj krud-moraj, kaj ĉi-teme tute malmmodernaj. Sed laŭ la leĝoj de la moderna kavalirismo, kiu estas la vera, mi diras kaj asertas, ke sendito, kiu aŭdacas enmanigi defion al kavaliro, ne petinte ties permeson, estas temerarulo, perfortinda perfortenda, bastoninda bastonenda...».

⁹ *fecialoj*, latine *fetiales*: Romiaj ne-tuŝeblaj heroldoj. Pli sube Attilio, evidente malklera, konfuzas ilin kun *oficiroj*.

«Nu respondu jenan silogismon¹⁰...».

«Nenio, nenio, nenio».

«Sed aŭskultu, aŭskultu, aŭskultu. Bati nearmiton *ja* estas perfidaĵo; *nu* la menciita sendito estis senarma; *do*...».

«Kviete, kviete, sinjoro komunumestro!». «Kial do kviete?». «Kviete, mi diras: kion vi al mi diraĉas? Perfidaĵo estus vundi homon per glavo, de malantaŭe, aŭ al li pafi en la dorson: kvankam eĉ ĉe tio povus estiĝi kazoj... Sed ni restu ĉe la temo: mi koncedas, ke ĉi tio ĝenerale povas nomiĝi perfidaĵo; sed apliki kvar bastonbatojn al aĉulo! Estus drole, se oni devus al li diri: gardu vin, mi vin bastonas; kiel oni dirus al honestulo: manon al glavo! – Kaj vi, respektata sinjoro doktoro, anstataŭ fari al mi subridojn, por komprenigi al mi, ke vi kun mi konsentas, kial vi ne subtenas miajn argumentojn per via lerta elokvento, por min helpi konvinki tiun ĉi sinjoron?». «Mi», konfuzete respondis la doktoro: «mi ĝojĝuas tiun ĉi erudician diskuton; kaj mi dankas al bela akcidento okaziginta tiel ĉarman batalon de intelektoj. Kaj aliflanke ne al mi apartenas verdikti: lia eminentega moŝto jam komisiis kiel juĝiston... tiun ĉi patron...».

«Ja vere»; diris Don Rodrigo: «sed kiel vi povas postuli, ke la juĝisto parolu, kiam la kverelantoj ne volas silenti?». «Mi mutiĝas», diris grafo Attilio. La komunumestro kunpremis la lipojn, kaj levis la manon, afektante rezignacion.

«Ha, al la ĉielo estu danko! Nu al vi, patro!» diris Don Rodrigo kun duon-moka seriozeco.

«Mi jam prezentis miajn ekskuzojn, deklarante min ne kompetenta», respondis frato Cristoforo, dum li redonis la

¹⁰ *silogismon*: formale logikan rezonon, kies konkludo estas nerefutebla.

glason al la servisto.

«Ne-taŭgaj ekskuzoj:» kriis la du kuzoj: «ni volas la verdikton».

«Se tiel statas la afero», reparolis la frato, «mia senvalora opinio estas, ke okazu nek defioj, nek mesaĝistoj, nek bastonbatoj».

La tablanoj ekrigardis unu la alian, miroplene.

«Ho, tute ekstravagance!» diris grafo Attilio. «Pardonu min, patro, sed ĝi estas ekstravaganca. Evidentas, ke vi ne konas la mondon».

«Ĉu li?» diris Don Rodrigo: «vi do volas ke mi tion rediru: li konas ĝin, kuzo mia, kiel vi: ĉu ne, patro? Diru, diru, ĉu vi ne trairis vian monduman karavan-vojon? ». La patro, anstataŭ respondi ĉi tiun afablecan demandon, paroletis sekrete al si mem: – tiuj ĉi vortoj koncernas cin; sed memoru, frato, ke ci estas ĉi tie, ne por ci mem; kaj ĉio, kio tuŝas nur cin, tute ne gravas. –

«Povas esti», diris la kuzo: «sed patro... kiel nomiĝas la patro?». «Patro Cristoforo», respondis pluraj.

«Sed, vi, plej respektinda patro Cristoforo, per ĉi-viaj maksimumoj vi volus renversi la mondon. Sen defioj! Sen bastonbatoj! Adiaŭ puntilio: senpuneco por ĉiuj aĉuloj. Bonŝance ke temas pri nebla hipotezo».¹¹ «Nu kuraĝe, doktoro», elbuŝigis Don Rodrigo, kiu pli kaj pli volus deturni la kverelon de l' du unuaj disputantoj, «kuraĝe, vi, kiu estas tute lerta pravigi ĉiujn. Ni vidu, kiel vi sukcesos pravigi pri tio patron Cristoforo».

«Verdire», respondis la doktoro, pugne tenante en-aere la forketon, kaj sin turnante al la patro, «verdire mi ne povas

¹¹ hipotezo: supozo.

kompreni, kiel patro Cristoforo, kiu estas samtempe kaj perfekta monako kaj mondano, ne konsideris ke lia verdikto, tute bona kaj ĝusta sur predikejo, tute ne valoras, respekteme mi tion diras, en kavalirisma disputo. Sed la patro pli bone ol mi scias, ke ĉiu afero oportunas sia-loke; kaj mi kredas, ke ĉi-kaze li celis eskapi per spritaĵo el la embaraso vortigi verdikton».

Nu kion respondi al rezonoj deduktitaj per saĝo tiel antikva kaj ĉiam nova? Nenion: kaj tiel faris nia frato.

Sed Don Rodrigo, por ĉesigi tiun disputon, estigis alian. «Koncerne alian aferon:» li diris, «mi aŭdis ke en Milano estas onidiroj pri pac-aranĝo». La leganto ja scias, ke en tiu jaro estis milito por heredigo de la Mantova duk-lando, kiun, post la morto de Vincenzo Gonzaga sen laŭleĝa idaro, okupaciis la duko de Nevers, lia plej proksima parenco. Ludoviko la 13-a, tio estas la kardinalo de Richelieu,¹² subtenis tiun princon, sian amikon kaj naturalizitan Francon¹³; reĝo Filipo la 4-a, tio estas la grafo de Olivares (kutime nomata la grafo-duko), ne volis lin tie, pro la samaj kialoj; kaj li ekmilitis kontraŭ li. Kaj, ĉar tiu duklando estis feŭdo¹⁴ de la imperio, ambaŭ partioj klopodadis ĉe imperiestro Ferdinando la 2-a, per faroj, per peticioj, per minacoj, unu por ke li havigu investituron al la nova duko; la alia por ke li rifuzu ĝin, kaj eĉ helpu por lin forpeli de tiu ŝtato.

¹² *la kardinalo de Richelieu*: ĉefministro, aganta ennome sed fakte anstataŭ reĝo Ludoviko. Same pli sube, pri *la grafo de Olivares* rilate al reĝo Filipo.

¹³ *naturalizitan Francon*: alprenintan francajn lingvon kaj morojn.

¹⁴ *feŭdo*: teritorio, kiun pli altranga nobelo (suzereno) liveris por regi al pli suba (vasalo).

«Mi ne estas for de la opinio», diris grafo Attilio, «ke la aferoj povas ĝustigi. Mi havas iajn indicojn...».

«Ne kredu, sinjoro grafo, ne kredu», interrompis la komunumestro. «Mi mem, en tiu ĉi anguleto, povas koni la aferojn; ĉar sinjoro hispana kastelestro, kiu pro komplezo estas iom al mi bonvola, kaj kiel filo de favorato de la grafo-duko, estas informita pri ĉio...».

«Mi al vi diras, ke ĉiutage mi havas la oportunon paroli en Milano kun tute aliaj gravuloj; kaj mi scias el fidinda fonto, ke la papo, kiel plej granda interesato por paco, faris proponojn...».

«Tio devas esti; la afero estas laŭdeva; lia papa moŝto plenumas sian devon; papo daŭre devas interpacigi la kristanajn princojn; sed la grafo-duko havas sian politikon, kaj...». «Kaj, kaj, kaj; ĉu vi, mia sinjoro, scias kion pensas la imperiestro nun-momente? Ĉu vi opinias ke en la mondo estas nenio krom la Mantova duklando? Multas la aferoj, kiujn li devas prizorgi, mia sinjoro. Ĉu vi scias, ekzemple, kia-grade la imperiestro nuntempe povas fidi je sia princo de Valdistano aŭ Vallistai, aŭ kiel ajn li nomiĝas, kaj ĉu...». «La ĝusta nomo en germana lingvo», interrompis denove la komunumestro, «estas Valjenstejno¹⁵, kiel plurfoje mi aŭdis nian sinjoron hispanan kastelestron elparoli ĝin. Sed restu trankvila, ĉar...».

«Ĉu vi volus instrui min...?» rebatis la grafo; sed Don Rodrigo al li okulumis, ke li ĉesu kontraŭdiri, pro amo al li. La grafo eksilentis, kaj la komunumestro, kvazaŭ de-grundigita

¹⁵ *Valjenstejno*: hispanigita formo. La germana nomo de tiu generalo estas Wallenstein. Sed tiuepoke oni diversmaniere asimilis fremdlingvajn proprajn nomojn. Pli sube temos pri Richelieu, ĉefministro de la franca reĝo, asimilita je *Riĉiliu'*.

ŝipego, ŝvel-vele ellasis la fluon de sia elokvento: «Valjenstejno ne multe min ĝenas; ĉar la grafo-duko havas okulon por ĉio kaj ĉiuloke; kaj se Valjenstejno volos kapricumi, tiun li kapablos irigi ĝusta-voje, aŭ per flato aŭ per bato. Li havas ĉio-vidan okulon, mi diras, kaj longajn manojn; kaj se li, kiel granda politikisto, havas fiksan ideon, kiel fakte kaj prave li havas, ke sinjoro duko de Nivers ne ekradiku en Mantova, sinjoro de Nivers tie certe ne ekradikos; kaj sinjoro kardinalo de Riĉiliu' faros kvazaŭ truon en akvo. Eĉ ridigas min tiu kara sinjoro kardinalo, volante konflikti kun la grafo-duko, nome kun Olivares. Veron mi diras: mi volus renaskiĝi post ducent jaroj,¹⁶ por aŭdi kion diros la posteuloj pri tiu ridinda pretendo. Necesas alio ol envio; cerbo necesas: kaj cerbo kia tiu de l' grafo-duko, estas unika en la mondo. La grafo-duko, miaj sinjoroj», plu-diris la komunumestro, daŭre kun vento poben,¹⁷ kaj eĉ li mem mirigite, ke li tute ne trafas en rifojn:¹⁸ «la grafo-duko estas olda vulpo, mi diru kun laŭdeva respekto, kiu perdigas liajn spurojn al ĉiu ajn: kaj kiam li afektas dekstren, oni certu, ke li sin direktos maldekstren: el kio sekvas ke tute neniu povas fanfaroni koni liajn planojn; kaj eĉ tiuj kiuj devas ilin efektivigi, eĉ tiuj kiuj skribas liajn depeŝojn, nenion pri ili komprenas. Mi rajtas paroli iom informite pri la afero; ĉar la bonvola sinjoro kastelestro degnas kun mi konversacii iom konfidence. La grafo-duko, male, detalege scias, kio bolas en la kuir-potoj de

¹⁶ *post ducent jaroj*: t.e. en la epoko de Manzoni, kiam, male ol la opinio de la urbestro, oni taksis ke Richelieu estis granda politikisto, kaj Olivares preskaŭ nekonata rolulo.

¹⁷ *poben*: vento dorsen, kaj do favora.

¹⁸ *rifojn*: elstarajn rokojn, danĝerajn por ŝipoj.

ĉiuj ceteraj kortegoj; kaj tuj kiam ĉiuj tiuj grandaj politikistoj (kelke da ili ja estas ruzegaj, oni devas konsenti), elpensis planon, la grafo-duko ĝin jam divenis, per sia granda cerbo, per siaj kaŝaj vojoj, per siaj ĉiuloke etenditaj fadenoj. La povra kardinalo de Riĉiliu' ĉi tie provas, tie flaras, ŝvitas, cerbumas: kaj kio poste? kiam li sukcesis fosi minon,¹⁹ li trovas jam pretigitan kontraŭ-minon de la grafo-duko...». Nur la ĉielo scias, kiam do la komunumestro albordiĝos; sed Don Rodrigo, stimulite ankaŭ de l' grimacoj de la kuzo, turniĝis abrupte, kvazaŭ inspirite, al servisto, kaj al li gestis, ke li alportu certan flaskon.

«Sinjoro komunumestro, miaj sinjoroj!» li diris: «toston por la grafo-duko! Kaj viaj moŝtoj ja povos al mi diri, ĉu la vino indas je la eminentulo». La komunumestro respondis per sinklino, el kiu travideblis speciala danko-sento; ĉar ĉion ajn, kion oni faris aŭ diris honore al la grafo-duko, li taksis kiel parte faritan al li mem».

«Vivu mil jarojn Don Gasparo Guzman, grafo de Olivares, duko de San Lucar, granda privatulo de reĝo Don Filipino la Granda, nia sinjoro!» li elkriis, levante la glason.

Privatulo, se iu tion ne sciis, estis tiuepoke la kutima termino, por signifi favoraton de princo.

«Vivu mil jarojn», respondis ĉiuj.

«Servu por drinki al la patro», diris Don Rodrigo.

«Pardonu min»; respondis la patro: «sed mi jam faris malordon, kaj mi ne rajtus...».

«Kiel!» diris Don Rodrigo: «temas pri tosto por la grafo-duko. Ĉu do vi volas kredigi, ke vi partiemas por la Navaranoj?».

¹⁹ *minon*: subteran kavaĵon por militaj celoj.

Tiel oni tiutempe mok-nomis la Francojn, el la princoj de Navaro, kiuj per Henriko la 4-a komencis reĝi super ili.

Ĉe tia instigego, konvenis drinki. Ĉiuj tabloj eksplodis je elkrioj, kaj laŭdegoj al la vino; escepte de la doktoro, kiu kun levita kapo, fiksaj okuloj, kaj kunpremitaj lipoj esprimis ege pli multe ol kiom li povus per vortoj.

«Nu kion vi diras pri ĝi, doktoro?» demandis Don Rodrigo. La doktoro eligis el la glaso nazon pli vermiljonan kaj briletan ol la glaso mem, kaj respondis, bombaste emfazante ĉiun silabon: «Mi diras, eldiras kaj verdiktas, ke ĉi tiu estas Olivares-o de vinoj: *censui et in eam ivi sententiam*²⁰, ke tia likvoro troveblas en neniu el dudek du regnoj de nia sinjoro reĝo, kiun Dio gardu: mi deklaras kaj difinas, ke bankedoj de eminentega sinjoro Don Rodrigo superas vespermanĝojn de imperiestro Heliogabalo²¹; kaj ke malsatego estas poreterne forpelita kaj ekzilita el tiu ĉi palaco, kie sidas kaj regas grandiozeco».

«Trafte dirite! Trafte difinite!» kriis unuvoĉe la tabloj; sed tiu vorto: malsatego, kiun la doktoro eligis hazarde, subite turnis ĉies mensojn al tiu malĝoja temo; kaj ĉiuj parolis pri malsatego. Ĉi-teme ĉiuj konsentis, almenaŭ rilate la esencaĵon; sed la bruego estis eble pli granda ol ĉe malkonsento. Ĉiuj parolis samtempe. «Ne ekzistas malsatego», diris unu: «kulpas la akaparistoj...». «Kaj la bakistoj», diris alia: «kiuj forkaŝas la tritikon. Ilin pendumi!».

«Prave; pendumi senkompate».

«Trafaj procesoj!» kriis la komunumestro.

«Kiaj procesoj?» kriis pli laŭte grafo Attilio: «senprocesa

²⁰ *censui et in eam ivi sententiam*: latine = tiel mi juĝis kaj verdiktis.

²¹ *Heliogabalo*: romia imperiestro, fama pro sia diboĉemo.

justico. Kapti tri aŭ kvar aŭ kvin aŭ ses el tiuj, kiuj laŭ publika onidiro estas konataj kiel plej riĉaj kaj plej hundecaj, kaj pendumi ilin».

«Ekzemplojn! ekzemplojn! sen ekzemploj nenio efektiviĝas».

«Pendumi! pendumi!, kaj aperos tritiko ĉiuflanke». La homo, kiu iam pasante tra foiro, ĝuis la harmonion, kiun estigas trupo da muzikantoj, kiam, inter du sonadoj, ĉiu el ili agordas sian muzikilon, grincigante ĝin kiel eble plej laŭte, por distinge ĝin aŭdi en la bruoj de la ceteraj, tiu homo imagu ke tia estis la kunsonado de tiuj interparoloj, se tiel oni rajtas ilin nomi. Dume oni ree kaj ree englasigis da tia vino; kaj ties laŭdoj trafe miksiĝis kun sentencoj pri ekonomiko; tiel ke la vortoj plej sonore kaj plej ofte aŭdataj estis: *ambrozio*²², kaj *pendumi*.

Dume Don Rodrigo turnis de temp' al tempo rigardojn al la ununura silentanto; kaj li vidis lin daŭre senmova, ne montranta senpaciencon nek urĝon, ne faranta geston, por memori, ke li atendas; sed kun aspekto montranta ke li ne intencas foriri ne aŭskultite. Don Rodrigo volonte forsendaĉus lin, kaj evitus tiun interparolon; sed forsendi kapucenon senaŭdienco ne apartenis al la reguloj de lia politiko. Ĉar la ĝenaĉo ne estis evitebla, li decidis tuj ĝin alfronti kaj liberigi sin el ĝi; li leviĝis de la tablo, kaj kun li la tuta ruĝvizaĝa kunularo, sen interrompi la bruadon. Poste, petinte forpermeson de la gastoj, li proksimiĝis, kun afekta digneco, al la frato, jam leviĝinta kune kun la aliaj; li diris al li: «Jen mi dispona je viaj ordonoj»; kaj li kondukis lin en alian salonon.

²² *ambrozio*: mitologia nutraĵo de la helenaj dioj; metafore: io eksterordinare bongusta.

VI

«Per kio mi povas obei vin?» diris Don Rodrigo, starigante sin meze de la salono. Tiel sonis liaj vortoj; sed ilia tono klare signifis: konsideru, kiu staras antaŭ vi, pesu viajn vortojn, kaj urĝiĝu.

Por kuraĝigi nian fraton Cristoforo, neniam rimedo estis pli certa kaj rapida, ol trakti lin arogante. Li, kiu staris hezite, serĉis la ĝustajn vortojn, kaj fingrumis la globetojn de la ĉezona rozario, kvazaŭ li esperus trovi en unu el ili taŭgan parolkomencon, ĉe tia ag-maniero de Don Rodrigo, tuj sentis veni al la lipoj pli da vortoj ol bezone. Sed konsiderante, kiom gravas ne fuŝi sian aferon, aŭ pli ĝuste alies aferon, li korektis kaj mildigis la frazojn venintajn en lian menson, kaj li diris, kun singarda humileco: «mi venas proponi al vi agon de justeco, petegi por karitat-faro. Iaj malbonuloj pretekstis la nomon de via eminenta moŝto, por teruri povran parokestron, kaj malpermesi, ke li plenumu sian devon, kaj por perforti du senkulpulojn. Vi ja povas per unu vorto ilin konfuzi, restarigi rajton, kaj malimpliki homojn, kontraŭ kiuj oni faras tiel kruelan perforton. Vi tion ja povas; kaj, ĉar vi povas... la konscienco, la honoro...».

«Vi al mi parolos pri mia konscienco, kiam mi venos pek-konfesi ĉe vi. Koncerne mian honoron, vi sciuj, ke ties gardanto estas mi mem, kaj nur mi; kaj ĉiun ajn, kiu aŭdacus sin enmiksi en tion, mi taksas kiel temerarulon, kiu mian honoron ofendas».

Per tiuj ĉi vortoj frato Cristoforo estis avertita, ke tiu senjoro strebas deturni liajn vortojn al plej aĉa direkto, por konduki la parolon en kverelon, kaj lin malhelpi veni al rigora konkludo; tial des pli multe li klopodis elteni, li decidis

glutaĉi, kion ajn la alia ŝatos diri, kaj tuj li respondis kun humila tono: «Se mi diris aferon, kiu al vi malplaĉas, certe ĝi estis kontraŭ mia intenco. Ja korektu min, riproĉu min, se mi ne scias paroli kiel konvenas; sed vi degnu aŭskulti min. Pro la ĉielo, pro tiu Dio, antaŭ kies juĝo ni ĉiuj devos prezentiĝi...» kaj, kun tiuj vortoj, kaptinte inter la fingroj la lignan kranieton de sia rozario, li metis ĝin antaŭ la okuloj de lia sulk-brova aŭskultanto, «ne obstinu rifuzi justaĵon tiel facilan kaj tiel ŝuldatan al povruoj. Pensu, ke la okuloj de Dio ĉiam estas super ili, kaj ke iliaj krioj, iliaj ĝemoj estas aŭskultataj tie supre. Senkulpeco estas potenca ĉe lia...». «He, patro!» krude interrompis Don Rodrigo: «Ja unu afero povas al mi forgesigi la grandan respekton, kiun mi havas por via monaka robo: nome vidi ĝin sur viro, kiu aŭdacas veni spioni en mia hejmo».

Tiu ĉi vorto flamigis la vizaĝon de la frato: kiu tamen, kun la mieno de homo, kiu glutaĉas maldolĉegan medikamenton, reparolis: «vi ne kredas, ke tia titolo konvenas al mi; en via koro vi sentas, ke la elpaŝo, kiun ĉi tie mi faras, estas nek malnobla nek malŝatinda. Aŭskultu min, sinjoro Don Rodrigo; ke ne venu la tago, en kiu vi pentos, ke vi ne aŭskultis min. Ne konsistigu vian gloron... kian gloron do, sinjoro Don Rodrigo! kian gloron fronte al homoj! kaj fronte al Dio! Vi ja multe potencas ĉi-tere; sed...». «Ĉu vi scias», diris Don Rodrigo, interrompante kun kolero, sed ne sen hororo, «ĉu vi scias, ke kiam min kaptas la kaprico aŭskulti predikon, mi tute scipovas viziti preĝejon, kiel ceteraj homoj? Sed en mia hejmo! Ho!» li daŭrigis afektante mok-rideton: «vi traktas min pli altranga ol mi estas. La predikisto hejme! Tian privilegion havas nur princoj».

«Kaj Dio, kiu postulas konton je la princoj pri la parolo, kiun li al ili aŭdigas en iliaj reĝejoj; tiu sama Dio nun praktikas al vi sian mizerikordon, sendante sian serviston: aĉan kaj malindan, sed Di-serviston, por peti favore al senkulpulino...».

«Entute, patro», diris Don Rodrigo, afektante ke li foriras, «mi ne scias kion vi intencas diri: mi nur komprenas, ke eble temas pri knabino, kiu zorgigas vian koron. Vi iru konfidenci al kiu ajn vi ŝatas, sed ne aŭdacu ĝeni pli longe nobelon».

Ĉe l' ekiro de Don Rodrigo, nia frato tuj starigis sin antaŭ li, sed kun granda respekto; kaj levinte la manojn, kvazaŭ por samtempe lin petegi kaj reteni, li ankoraŭ respondis: «ŝi premas mian koron, ja vere; sed ne pli multe ol vi; temas pri du animoj, ambaŭ por mi pli valoraj ol mia sango. Don Rodrigo! por vi nenion mi povas fari, krom preĝi Dion, sed tion mi faros el mia tuta koro. Ne respondu al mi negative: ne tenu povran senkulpulinon en angoro kaj teruro. Unu vorto viaflanke povas ĉion solvi».

«Nu bone», diris Don Rodrigo, «ĉar vi kredas, ke mi povas multon fari por ĉi tiu persono; ĉar tiu ĉi persono tiel multe vin korprenas...». «Nu kio?» reparolis anxie patro Cristoforo, al kiu la mieno kaj sinteno de Don Rodrigo ne allasis la esperon, kiun liaj vortoj ŝajnis anonci.

«Nu, konsilu, ke ŝi venu ĉi tien, sub mian protekton. Nenio plu al ŝi mankos, kaj neniu aŭdacos ĝeni ŝin, aŭ mi tute ne estas kavaliro».

Ĉe tia propono, la indigno de l' frato, ĝis tiam apenaŭ retenata, eksplodis. Ĉiuj bonaj intencoj pri singardo kaj pacienco disvaporigis: la malnova homo akordiĝis kun la

nova; kaj en tiaj okazoj frato Cristoforo vere fortikis kvazaŭ duope. «Vian protekton!» li elkriis, farante du retropaŝojn; li fiere apogis sin sur la dekstra kruro, metis la dekstran manon al la kokso, levis la maldekstran kun la montro-fingro cele al Don Rodrigo, kaj rigardis lian vizaĝon per du flamaj okuloj: «vian protekton! Estas ja pli bone, ke vi tion diris, ke tian proponon vi faris al mi mem. Vi superis ĉian ĝustan mezuron; kaj mi ne plu timas vin».

«Kiel ci parolas, frataĉo?». «Mi parolas kiel oni parolu al homo, kiu estas forlasita de Dio, kaj do ne plu povas timigi. Via protekto! Mi ja sciis, ke tiu senkulpulino estas sub la protekto de Dio; sed nun vi, vi mem tion al mi konfirmas tiel certe, ke mi ne plu bezonas singardon, por paroli al vi pri ŝi. Lucia-n mi diras: vidu, kiel mi eldiras ĉi tiun nomon kun levita frunto kaj senmovaj okuloj».

«Kiel! en ĉi-domo...!». «Mi kompatas ĉi tiun domon: malbeno ŝvebas super ĝi. Konsideru, ĉu la justeco de Dio sin detenu antaŭ kelke da ŝtonoj, aŭ timemu antaŭ kelke da armitoj! Vi kredis, ke Dio faris kreaĵon laŭ sia bildo, por havigi al vi la plezuron turmenti ĝin laŭplaĉe! Vi kredis, ke Dio ne kapablos defendi ŝin! Vi neglektis lian averton! Vi juĝis vin mem. La koro de la Faraono¹ estis malmola samkiel la via; kaj Dio kapablis ĝin rompi. Lucia estas sekura kontraŭ vi. Tion al vi diras mi, povra frateto; koncerne vin mem, vi atente aŭskultu, kion mi al vi promesas. Venos tago...». Don Rodrigo dume restis inter kolero kaj miro, ŝtoniĝis, ne trovis vortojn; sed kiam li aŭdis lin ek-profeti, al la kolero aldoniĝis fora, mistera teruro.

¹*Faraono*: la malpia egipta suvereno, kiu, laŭ Biblia rakonto, vane provis malobei la Dian ordonon malsklavigi la Izraelan popolon.

Rapide li kaptis tiun levitan minacan manon, kaj laŭtigante sian voĉon, por ĉesigi tiun de la misaŭgura profeto, li kriis: «For de ĉi tie, temerara krudulo, kapuĉita sentaŭgulo».

Tiel ĉi klaraj vortoj tuj kvietigis patron Cristoforo. En lia menso la ideo pri mistrakto kaj insulto jam delonge kaj firme kuniĝis kun tiu pri pacienco kaj silento, tiel ke, ĉe tia komplimento, ĉia sento de kolero kaj ekscito forfalis, kaj al li nur restis aŭdi trankvile tion, kion al Don Rodrigo plaĉos aldoni. Tial, retirinte kviete la manon el la ungegoj de la nobelo, li mallevis la kapon, kaj restis senmova, kiel, ĉe vento-ĉeso, kulmine de tempesto, skuegita arbo rearanĝas siajn branĉojn, kaj akceptas la hajlon, kia la ĉielo ĝin faligas.

«Mis-civiliza parvenuo!²» daŭrigis Don Rodrigo: «vi traktas onin laŭ via nivelo. Sed danku la monakan robon, kiu kovras ĉi-viajn malnobelajn ŝultrojn, kaj al vi evitigas la karesojn konvenajn al viaj samranguloj, por ilin instrui, kiel paroli. Eliru per viaj kruroj, ĉi-foje; kaj poste ni vidos».

Tion dirante, li montris, kun malŝatema ordon-gesto, la pordon frontan al tiu, tra kiu ili eniris; patro Cristoforo klinis la kapon kaj foriris, lasante Don Rodrigon tramarŝi furiozapaŝe la batalkampon.

La frato, ferminte malantaŭ si la pordon, vidis en la ĉambro, kien li eniris, viron foriranta malrapide, tuŝe al la muro, kvazaŭ por ne vidiĝi el la ĉambro de la interparolo; kaj li rekonis la oldan serviston venintan akcepti lin ĉe la enirpordego. Tiu viro vivis en tiu hejmo eble jam kvardek jarojn, tio estas de antaŭ la naskiĝo de Don Rodrigo; tien li eniris serve al lia patro, kiu estis tute alispeca homo. Post ties morto, la nova mastro eldomigis la tutan servistaron kaj

² *parvenuo*: malnobelo riĉiĝinta sed senkultura.

kunmetis novan anaron, sed retenis tiun serviston, ĉu pro tio ke li estis jam maljuna, ĉu ĉar, malgraŭ la tute malsamaj principoj kaj moroj, li tamen kompensis tiun ĉi difekton per du ecoj: alta konsidero pri l' digno de la domo, kaj granda spertlerto pri la ceremoniaro, kies plej malnovajn tradiciojn kaj plej etajn detalojn li konis pli bone ol ĉiu ajn. Fronte al la sinjoro mastro, neniam la povra servisto aŭdacus aludi, des malpli esprimi malaprobos pri tio, kion li vidis ĉiutage: li apenaŭ eligis elkrion, interdentan riproĉon al la kun-servistoj. Ĉi-lastaj primokis la aferon, kaj foje eĉ amuziĝis, tuŝante tiun ĉi temon, por ke li diru pli multe ol kiom li volus, kaj por lin aŭdi rekanti la laŭdojn pri la antikva viv-maniero en tiu domo. Liaj cenzur-diroj atingis la orelojn de la mastro nur akompanate de la rakonto pri la mok-ridoj faritaj tiu-rilate; tiel ke, eĉ por la mastro, ili estiĝis objekto de moko, sen ofendiĝo. Nur en la tagoj de invito kaj akceptado, la maljunulo fariĝis serioza kaj grava rolulo.

Patro Cristoforo, pasante, lin rigardis, lin salutis, kaj pluiris sian vojon; sed la maljunulo al li misterplene proksimiĝis, metis la fingron al la buŝo, kaj poste per la sama fingro al li gestis, ke li sekvu lin en malluman koridoreton. Kiam ili tien alvenis, li al tiu diris mallaŭte: «Patro, ĉion mi aŭdis, kaj mi bezonas paroli al vi».

«Diru rapide, mia bonulo».

«Ne ĉi tie: ve, se la mastro ekvidas... Sed mi scias multajn aferojn; kaj mi strebos veni morgaŭ al la monakejo».

«Ĉu estas ia plano?». «Tute certe io ŝvebas en-aere: tion mi jam sukcesis kompreni. Sed nun mi viglos, kaj mi esperas malkovri ĉion. Lasu al mi la aferon. Ĉi tie mi estas devigata vidi kaj aŭdi aferojn...! fajrajn aferojn! Mi estas en domo tia...

Sed mi volas savi mian animon».

«La Di-Sinjoro benu vin!» kaj mallaŭte eldirante ĉi tiujn vortojn, la frato metis manon sur la blankan kapon de la servisto, kiu, kvankam pli olda ol li, staris antaŭ li klinite, kun fileca teniĝo.

«Dio rekompencos vin», daŭrigis la frato: «nepre venu morgaŭ».

«Mi venos», respondis la servisto: «sed vi tuj foriru kaj... pro la ĉielo... ne diru mian nomon». Ĉe tiuj vortoj li ĉirkaŭrigardis, kaj li eliris, tra la alia flanko de la koridoreto, en saloneton, kiu kondukis en la korton; kaj, vidinte la kampon libera, li elvokis la bonan fraton, kies mieno esprimis respondon al lia lasta peto pli klaran ol ajna promesego. La servisto al li fingre montris la elirejon; kaj la frato foriris sen aliaj vortoj.

Tiu viro kaŝ-aŭskultis ĉe l' pordo de sia mastro: ĉu li bone kondukis? Kaj ĉu prave frato Cristoforo laŭdis lin pro tio? Laŭ la plej komunaj kaj senkontraŭdiraj reguloj, ĝi estas afero tre malbona; sed ĉu tiun ĉi kazon oni ne povus konsideri escepta? Kaj ĉu ekzistas esceptoj al plej komunaj, plej senkontraŭdiraj reguloj? Gravaj demandoj; sed la leganto mem ilin solvos, se tion li emas. Ni ne intencas eldiri juĝojn: al ni sufiĉas havi faktojn por rakonti.

Kiam frato Cristoforo eliris kaj turnis la dorson al tiu domaĉo, li ekspiris pli libere, kaj rapide desupris laŭdeklive, flam-ruĝa en la vizaĝo, emociita kaj ekscitoplena, kiel ĉiu povas imagi, pro ĉio kion li aŭdis kaj diris. Sed tiu neatendita sin-propono de la maljunulo estis por li granda konsolo: al li ŝajnis ke la Ĉielo al li montris videblan signon de sia protekto. – Jen fadeno, li pensis, fadeno, kiun la Providenco metas en

miajn manojn. Kaj ĝuste en tiu domo! Kaj kiam mi eĉ ne imagis ĝin serĉi! – Tion remaĉante, li levis la okulojn okcidenten, li vidis la sunon malalta, jam tuŝonta la montopinton, kaj li pensis, ke restas tre malmulte da taglumo. Tiam, kvankam li sentis la ostojn pezaj kaj senfortigitaj pro la diversaj penaĉoj de tiu tago, tamen li rapidis, por havigi ajnan raporton al siaj protektatoj, kaj reatingi la kapucenejon antaŭ noktiĝo: kio estis unu el leĝoj de la kapucena kodo plej precizaj kaj plej rigore observataj.

Intertempe en la dometo de Lucia estis proponitaj kaj diskutataj planoj, pri kiuj konvenas informi la leganton. Post la foriro de la frato, la restinta triopo kelktempe silentis: Lucia, malĝoje preparis la tagmanĝon; Renzo daŭre forironte, por ne vidi ŝin tiel korpremata, ne decidis ekiri; Agnese ŝajne tute okupita pri la haspelo, kiun ŝi turnadis. Sed ŝi estis maturiganta planon; kaj kiam ĝi ŝajnis al ŝi matura, ŝi rompis la silenton per jenaj vortoj:

«Aŭskultu, filetoj! Se vi volas havi kuraĝon kaj lertecon kiom bezone, kaj vi fidas je via patrino», ĉe tiu *via* Lucia skuiĝis, «mi min devontigas elturni vin el ĉi tiu impliko, eble pli bone kaj pli frue ol patro Cristoforo, kvankam li estas homo tia kia li estas». Lucia hezitis, kaj rigardis Agnese-n kun mieno kiu esprimis miron pli ol fidon je tiom grandioza promeso; kaj Renzo tuj diris: «Ĉu kuraĝi? Ĉu lerti? Nu diru, diru, kio do fareblas».

«Ĉu ne estas vere», daŭrigis Agnese, «ke se vi jam estus geedzoj, la afero estus jam progresinta? Kaj ke por ĉio cetera pli facile troviĝus rimedo?». «Ĉu estas dubinde?» diris Renzo: «post geedziĝo... tuta mondo estas hejmloko; kaj kelkpaŝe distance de ĉi tie, en la Bergama lando, la silko-laboruloj estas

plej ŝate akceptataj. Vi ja scias, kiomfoje mia kuzo Bortolo instigis min transloĝi tien, ĉe lin, dirante, ke mi prosperus, kiel li mem: kaj se mi neniam elaŭdis lin, ĝi estas... nu kial? ĉar mia koro estis ĉi tie. Post geedziĝo, oni iras ĉiuj kune, oni aranĝas hejmon tie, oni vivas plentrankvile, for de la ungegoj de tiu kanajlo, for de la tento fari frenezaĵon. Ĉu ne, Lucia?». «Jes», diris Lucia: «sed kiel...?». «Kiel mi diris», reparolis la patrino: «kuraĝon kaj lertecon; kaj la afero estas facila».

«Ĉu facila!» diris kune la duopo, laŭ kiu la afero fariĝis tiom strange kaj suferige malfacila».

«Facila, se kapabli ĝin fari», replikis Agnese. «Aŭskultu min atente, kaj mi klopodos komprenigi ĝin al vi. Mi aŭdis kompetentajn homojn diri, kaj unu kazon mi mem vidis, ke, por geedziĝi, oni ja bezonas pastron, sed ne lian konsenton: sufiĉas lia ĉeesto».

«Kiel statas la afero?» demandis Renzo.

«Aŭskultu, kaj vi aŭdos. Necesas havi du atestantojn tute rapidajn kaj tute akordajn. Oni iras al la parokestro: nepras kapti lin neatendite, tiel ke li ne havu tempon por forkuri. La viro diras: sinjoro pastro, ĉi tiu estas mia edzino; la virino diras: sinjoro pastro: ĉi tiu estas mia edzo. Nepras ke la pastro aŭdu, ke la atestantoj aŭdu, kaj tiam la geedziĝo estas farita, tute sankta, kvazaŭ ĝin benus la papo mem. Kiam la vortoj estas diritaj, la pastro povas ja kriegi, hurli, diabli; estas senutile: vi estas geedzoj».

«Ĉu tio eblas?» elkriis Lucia.

«Kiel!» diris Agnese: «vidu, ĉu dum la tridek jaroj, kiujn mi travivis en tiu ĉi mondo antaŭ via naskiĝo, mi nenion lernis. La afero statas ĝuste tia, kiel mi diras: tiagrade ke, unu el miaj amikinoj, strebante edzigi iun viron kontraŭ la volo de

siaj gepatroj, ĝuste en tiu maniero efektivigis sian intencon. La pastro, kiu suspektis pri tio, ja viglis; sed la diableca duopo sukcesis agi tiel lerte, ke ili surprizis lin en ĝusta momento, diris la vortojn, kaj fariĝis geedzoj; kvankam la povrulino pentis post tri tagoj».

Agnese diris la veron, ĉu pri la ebleco, ĉu pri la risko malsukcesi: fakte, ĉar tian rimedon oni aplikis nur post malhelpo aŭ rifuzo tra ordinara vojo, la parokestroj tre zorgis eviti tian perfortan kunlaboron; kaj kiam unu el tiaj gefianĉaj paroj akompanate de atestantoj surprizis pastron, tiu faris ĉian klopodon por eskapi, kiel Proteo³ el la manoj de l' devigantoj lin profeti.

«Se tio estus vero, Lucia!» diris Renzo, rigardante ŝin kun petege atenda mieno.

«Kiel! se tio estus vera!» diris Agnese. «Eĉ vi mem kredas, ke mi diras inventaĵojn. Mi klopodegas por vi, kaj oni min ne kredas: nu bone; elturniĝu kiel vi povas: mi lavas miajn manojn».⁴

«Ha, ne! ne forlasu nin», diris Renzo. «Mi tion diras, ĉar la afero al mi ŝajnas tro bela. Mi estas en viaj manoj; mi konsideras vin ĝuste kvazaŭ mian patrinon».

Ĉi tiuj vortoj malaperigis la indigneton de Agnese kaj forgesigis ŝian intencon, kiu verdire ne estis serioza.

«Sed kial do, panjo», diris Lucia, kun siaspeca humila teniĝo, «kial tiu ĉi afero ne venis en la kapon de patro Cristoforo?». «Ĉu veni en la kapon?» respondis Agnese: «imagu do, ĉu ĝi ne venis en lian kapon! Sed verŝajne li ne

³*Proteo*: mitologia duondio kapabla alpreni plej diversajn formojn, por eskapi de la homoj lin devigantaj profeti kontraŭvole.

⁴ *mi lavas miajn manojn* = mi ne volas havi koncernon.

volis paroli pri ĝi».

«Kial?» demandis samtempe ambaŭ gejunuloj.

«Ĉar... ĉar, se vi tion ĉi volas ekscii, la religiuloj diras, ke verdire ĝi estas afero ne tute bona».

«Kiel povas esti, ke afero estas ne tute bona, sed, farite, ĝi estas bone farita?» diris Renzo.

«Kion mi al vi diru?» respondis Agnese. «La leĝon faris ili mem, laŭplaĉe; kaj ni, malriĉuloj, ne povas ĉion kompreni. Kaj krome kiom da aferoj... Jen: estas kiel ellasi pugnon kontraŭ homon. Ĝi ne estas konvena, sed, se vi donis pugnobaton, eĉ la papo ne povas ĝin forigi».

«Se estas afero ne bona», diris Lucia, «oni ne rajtas ĝin fari».

«Kion!» diris Agnese, «ĉu mi intencus al vi konsili ion kontraŭ la timo al Dio? Se ĝi estus kontraŭ la volo de viaj gepatroj, por edzigi fiulon... sed se mi kontentas, kaj ĝi estas por edzigi ĉi tiun fileton; kaj ĉiujn malhelpojn estigas kanajlo; kaj la respektinda pastro...».

«La afero estas tiel klara, ke ĉiu ajn komprenus ĝin», diris Renzo.

«Oni devas ne menciigi la aferon al patro Cristoforo, antaŭ ol ĝi estos farita», daŭrigis Agnese: «sed kiam ĝi estos farita kaj sukcesinta, kion vi pensas, ke la patro al vi diros? – Ha, filino! gravan bubaĵon vi al mi faris –. Tion devas diri religiuloj. Sed ja kredu, ke en sia koro li mem kontentos».

Lucia, kvankam ne trovante, kion respondi al tiu rezono, tamen ne ŝajnis konvinkita; sed Renzo, tute kuraĝigite, diris: «Se tiele estas, la afero estas tuj farota».

«Trankvile!» diris Agnese. «Kaj kio pri la atestantoj? Ĉu trovi duopon, kiu konsentus, kaj kiu intertempe kapablus

silenti! Kaj ĉu sukcesi surprizi la sinjoron pastron, kiu jam du tagojn estas enfermita hejme? Kaj reteni lin? Ĉar, kvankam nature korpulenta, mi povas certigi vin, ke, vidante vin aperi tiele, li fariĝos kiel kato, kaj li forkuros, kvazaŭ diablo for de benita akvo».

«Ja mi eltrovis la rimedon, mi eltrovis ĝin» diris Renzo, batante per pugno la tablon, kiu saltetigis la manĝuojn surmetitajn por la tagmanĝo. Kaj li daŭrigis, eldirante sian penson, kiun Agnese aprobis tute kaj detale.

«Temas pri trompaĵoj», diris Lucia: «pri ne glataj aferoj. Ĝis nun ni agis sincere: ni plu iru kun fido, kaj Dio nin helpos: tion diris patro Cristoforo. Ni aŭdu lian konsilon».

«Lasu ke vin gvidu persono, kiu spertas pli multe ol vi», al ŝi diris Agnese gravmiene. «Kial demandi konsilojn? Dio diras: Dion fidu, sed ne senfare sidu. Al la patro ni ĉion rakontos, kiam la afero estos farita».

«Lucia», diris Renzo, «ĉu vi volas forlasi min nun? Ĉu ni ne faris ĉion kiel bonaj kristanoj? Ĉu ni ne devus jam esti geedzoj? Ĉu ne la pastro mem jam fiksis tagon kaj horon? Kiu do kulpas, se ni nun devas al ni helpi per iom da sagaco? Ne, vi ne forlasos min. Mi foriras kaj tuj revenos kun respondo».

Kaj salutante Lucia-n per petema gesto kaj Agnese-n per inteligenta okulumo, li foriris rapide.

Afliktoj akriĝas cerbon: kaj Renzo, kiu en la ĝis-tiama glata vivo neniam havis oportunon tre akriĝi la sian, en tiu kazo elpensis elturniĝon, kiu honorus eĉ juriston. Laŭ sia plano, li iris rekte al ne fora dometo de iu Tonio; kaj li trovis lin en la kuirejo, kun unu genuo sur la ŝtupo de la fajrujo, kaj tenanta per unu mano la randon de kaldrono starigita sur fajrocindro, dum li knedis per kurba lignaĵo malgrandan polenton

el fagopiro⁵. La patrino, unu frato, kaj la edzino de Tonio, sidis ĉe-table; kaj tri aŭ kvar infanoj, staraj apud la paĉjo, atendis la momenton de surtabligo, fiks-rigardante la kaldronon. Sed mankis la gajeco, kiun kutime vido de tagmanĝo donas al la homo, kiu per pena laboro ĝin meritis. La volumo de la polento proporciis kun la magra jar-rikolto, sed tute ne kun la nombro kaj la apetito de la tabloj: kaj ĉiu el ili, fiks-rigardante la komunan manĝaĵon per strab-rigardo plena de rabia amo, ŝajnis pripensi la parton de apetito, kiu nepre plurestos. Dum Renzo interŝanĝis salutojn kun la familio, Tonio elkaldronigis la polenton sur la plataĵon el fago-ligno pretigitan por ĝin ricevi: kaj ĝi aspektis kvazaŭ malgranda luno, en granda rondo de vaporetoj. Tamen la virinoj afable diris al Renzo: «ĉu vi volas esti priservita?». Tian ĉi komplimenton komparano lombarda (kaj el kiom da aliaj landoj!) neniam evitas diri, se oni lin trovas ĉe-table, eĉ se l' vizitanto estus riĉa manĝegulo ĵus finmanĝinta, kaj la kampulo estus ĉe sia lasta buŝpleno.

«Mi dankas vin», respondis Renzo: «mi venis nur por paroleti al Tonio; kaj se vi volas, Tonio, ni povas iri tagmanĝi en la gastejo, por ne ĝeni viajn virinojn, kaj tie ni parolos». La propono estis por Tonio des pli ŝatata, ju malpli atendita, kaj la virinoj, kaj eĉ la infanoj (ĉar pri tio ili frue prudentiĝas) ne malvolonte vidis la plej timindan konkuranton foriĝi de la polento. La invitito ne faris aliajn demandojn, kaj ekiris kun Renzo.

Atinginte la vilaĝan gastejon, ili eksidis tute libere, en perfekta soleco, ĉar la mizero malkutimigis ĉiujn

⁵ *fagopiro*: herbo, el kies grajnoj oni eltiras farunon.

frekventantojn de tiu delicejo.⁶ Renzo mendis la nemul-ton, kiu troveblis, kaj malplenigis pokalon da vino; poste, kun mistera mieno, li diris al Tonio: «Se vi volas fari komplezon malgrandan al mi, mi volas fari grandan al vi».

«Parolu, parolu; vi ja ordonu», respondis Tonio, englasigante. «Hodiaŭ eĉ en fajron mi ĵetus min por vi».

«Vi ŝuldas dudek kvin lirojn al sinjoro pastro, kiel lupagon de lia kampo, kiun vi kulturis pasintjare».

«Ha, Renzo, Renzo! vi fuŝas mian aferon. Kian temon vi tuŝas? Vi forigis mian bonhumoron».

«Se mi al vi mencias la ŝuldon», diris Renzo, «ĝi estas ĉar, se vi volas, mi intencas havigi al vi la rimedon por ĝin pagi».

«Ĉu vere?». «Vere. Ĉu?... ĉu vi estus kontenta?». «Ĉu kontenta? Diable mi estus kontenta! Almenaŭ por ne plu vidi tiujn grimacojn kaj tiujn kap-gestojn de sinjoro pastro, ĉiufoje kiam ni renkontiĝas. Kaj ĉiufoje: Tonio, memoru: Tonio, kiam do ni vidiĝu koncerne tiun negoc-aferon? Tiagrade ke eĉ en la preĝejo, kiam dum la prediko li fiks-rigardas min per tiaj okuloj, mi preskaŭ timas, ke li al mi diras publike: Tiujn dudek kvin lirojn! Malbenataj la dudek kvin liroj! Kaj krome li al mi redonus la oran kolĉenon de mia edzino, kiun mi nun forvendus kontraŭ egalvalora polento. Sed...». «Sed, sed, se vi volas fari al mi komplezeton, la dudek kvin liroj jam estas pretaj».

«Nu diru».

«Tamen...!» diris Renzo, metante silent-ordone fingron al sia buŝo.

«Ĉu tia rekomendo necesas? vi konas min».

⁶ *delicejo*: loko de delikataj manĝo- kaj drinko-ĝuoj.

«Sinjoro pastro elmetas iajn sensencajn rezonojn, por prokrasti mian edziĝon; mi male volas tuj finaranĝi ĝin. Oni min certigas ke, se al li sin prezentas la gefianĉoj kun du atestantoj, kaj mi diras: ĉi tiu estas mia edzino; kaj Lucia: ĉi tiu estas mia edzo, la geedziĝo estas tute farita. Ĉu vi min komprenis?». «Ĉu vi volas, ke mi venu kiel atestanto?». «Ĝuste».

«Kaj ĉu vi pagos por mi la dudek kvin lirojn?». «Tion mi intencas».

«Nur aĉulo tion rifuzus».

«Sed necesas trovi duan atestanton».

«Mi jam trovis. Mia frato Gervaso, tia naivulo, faros tion, kion mi al li diros. Ĉu vi pagos al li por drinki?». «Kaj eĉ por manĝi», respondis Renzo. «Ni kondukos lin ĉi tien, por ke li estu gaja kune kun ni. Sed ĉu li kapablos plenumi la aferon?». «Mi instrukcios lin: vi ja scias, ke mi ricevis ankaŭ lian porcion de cerbo».

«Morgaŭ...». «Bone».

«Ĉe vesperiĝo...». «Bonege».

«Sed!...» diris Renzo, metante denove la fingron sur la buŝon.

«Pu!...» respondis Tonio, klinante la kapon super la dekstran ŝultron, kaj li levis la maldekstran manon, kun mieno kiu signifis: vi ofendas min.

«Tamen, se via edzino vin demandas, kaj sendube ŝi demandas...». «Koncerne mensogojn, mi mem ŝuldas al mia edzino, kaj tiom multe, ke mi ne scias, ĉu mi sukcesos iam ajn kvitiĝi⁷ kun ŝi. Ian inventaĵon mi ja trovos, por kvietigi ŝian koron».

⁷ kvitiĝi: senŝuldiĝi.

«Morgaŭ matene», diris Renzo, «ni interparolos pli trankvile, por akordiĝi detale pri ĉio».

Ĉe tio ili forlasis la gastejon. Tonio ekiris hejmen, kaj cerbumis, kian mensogaĵon rakonti al la virinoj; kaj Renzo, iris raporti pri la faritaj akordiĝoj.

Intertempe Agnese vane klopodis persvadi la filinon. Ĉi-lasto, ĉe ĉiu rezono, obĵetis jen unuan jen duan alternativon: aŭ la afero estas malbona, kaj do oni tute ne faru ĝin; aŭ ĝi ne estas tia, kaj kial do prisilenti ĝin al patro Cristoforo?

Renzo alvenis tute fiero, faris sian raporton, kaj finis per *ĉu-u?*, interjekcio, kiu signifas: mi estas brava, ĉu ne? ĉu troveblus io pli bona? ĉu vi elpensus ĝin? Kaj cent similajn aferojn.

Lucia balancis delikate la kapon; sed la fervor-plena duopo malmulte ŝin konsideris, kiel oni kutimas rilate infanon, al kiu oni ne esperas komprenigi la pravecon de io, kaj kiun oni tamen per petoj kaj aŭtoritateco devigos al tio, kion oni de li postulas.

«Ja bone», diris Agnese: «ja bone; tamen... vi ne pensis pri ĉio».

«Kio ankoraŭ mankas?» respondis Renzo.

«Kaj kio pri Perpetua? Vi ne pensis pri Perpetua. Tonion kaj lian fraton, ŝi allasos; sed vin! vin kune! imagu! certe, al ŝi estas ordonite fortene vin pli ol knabon for de arbo kun maturaj piroj».

«Kion fari?» diris Renzo, iom embarasite.

«Jen: tion pripensis mi. Mi mem venos kun vi; kaj mi havas sekreton por logi ŝin, kaj por ŝin ensorĉi tiel, ke ŝi ne ekvidu vin ambaŭ kaj allasu vin. Mi vokos ŝin, kaj mi tuŝos iun klavon... vi vidos».

«Vi estu benata», elkriis Renzo: «ĉiam mi diris, ke vi estas nia helpilo en ĉio».

«Sed ĉio ĉi nenion efikas», diris Agnese, «se ne konvinkiĝas ŝi, kiu obstine diras, ke tio estas peko».

Ankaŭ Renzo aplikis sian elokventon; sed Lucia estis neŝancebla.

«Mi ne scias, kion respondi al ĉi-viaj rezonoj», ŝi diris: «sed mi vidas, ke por tion efektiviĝi laŭ via diro, necesas pluri tra kaŝ-trompoj, mensogoj, fikcioj. Ha Renzo! Ne tiel ni komencis. Mi volas fariĝi via edzino», kaj ŝi tute ne povis eldiri tiun ĉi vorton kaj deklari tiun intencon, sen ruĝiĝo: «mi volas esti via edzino, sed laŭ rekta vojo, kun timo al Dio, ĉe altaro. Ni konfidu la aferon al Tiu supra. Ĉu vi opinias, ke Li ne kapablas trovi rimedon, por nin helpi, pli bone ol kiom povus fari ni mem per ĉiuj ĉi ruzaĵoj? Kaj kial sekretumi kun patro Cristoforo?». La disputo pludaŭris, kaj ne ŝajnis proksima al finiĝo, kiam rapida paŝo-bruo de sandaloj, kaj susuro de svingata robo, simile al tiu de ripetaj vento-blovoj kontraŭ ŝrumpan velon, anoncis la alvenon de patro Cristoforo. Ĉiuj kvietiĝis; kaj Agnese havis apenaŭ la tempon flustri ĉe l' orelo de Lucia: «nu gardu vin, nenion diru al li».

VII

Patro Cristoforo alvenis kun sinteno de l' brava kapitano, kiu, post senkulpa malvenko de grava batalo, afliktita sed ne senkuraĝigita, zorgo-plena sed ne konsternita, kurante sed ne fuĝante, iras kien bezono postulas, por ŝirmi minacatajn postenojn, kolekti soldatarojn, doni novajn ordonojn.

«La paco estu kun vi», li diris, enirante. «Nenio espereblas el la homo: des pli endas fidi al Dio: kaj jam mi havas indicon pri lia protekto».

Kvankam neniu el la triopo tre multe esperis el la provo de patro Cristoforo, ĉar vidi potenculon rezigni perforton nedevigite, kaj pro nura komplezo al senarmitaj preĝpetoj, estis afero pli senprecedenca¹ ol malofta; tamen tiu malfeliĉa certeco estis forta bato por ĉiuj. La virinoj klinis la kapon; sed en la animo de Renzo kolero superis deprimiĝon. Tiu anonco trovis lin jam afliktita pro tiom da ĉagrenaj surprizoj, da vanaj provoj, da disreviĝintaj esperoj, kaj en tiu momento des pli incitita pro la rifuzoj de Lucia.

«Mi volas ekscii», li elkriis, grincigante la dentojn, kaj laŭtigante la voĉon, kiom neniam antaŭe li faris ĉeeste de patro Cristoforo; «mi volas ekscii, kiajn pravigojn eldiris tiu hundaĉo, por aserti... por aserti, ke mia edzino ne devas esti mia edzino».

«Povra Renzo!» respondis la frato, kun voĉo grav-tona kaj kompatoplena, kaj kun rigardo, kiu amoplene ordonis kvietiĝon: «se la potenculo, kiu volas fari maljustaĵon, ĉiam estus devigata sin pravigi, la aferoj ne irus ĉi tiel».

«Ĉu do tiu hundaĉo diris, ke li malpermesas ĉar li malpermesas?». «Eĉ ne tion li diris, povra Renzo! Ja estus

¹ *senprecedenca*: neniam okazinta.

avantaĝe se, por malbonfari, almenaŭ oni devus tion malkaŝe konfesi».

«Sed ion li nepre diris: kion do diris tiu infera brulŝtupo?». «Liajn vortojn mi aŭdis, sed mi ne scipovas ilin ripeti. La vortoj de perforta maljustulo penetras kaj eskapas. Li povas koleriĝi, ke vi montras suspekton pri li, kaj samtempe al vi sentigi, ke la objekto de via suspekto estas certa: li povas insulti, kaj sin deklari ofendita, ofendaĉi kaj postuli praviĝon, teruri kaj plendi, aspekti senhonta kaj senriproĉa. Ne plimulte demandu. Tiu viro ne eldiris la nomon de ĉi tiu senkulpulino, nek la vian; li eĉ ne komprenigis, ke li konas vin, li ne diris ke li ion postulas; sed... sed bedaŭrinde mi devis subkompreni, ke li estas neŝancebla. Tamen, fidon je Dio! Vi, povrulinoj, ne deprimiĝu; kaj vi, Renzo... ho! ja kredu, ke mi identiĝas kun via situacio, ke mi tute sentas, kio do trapasas vian koron. Sed paciencu! Ĝi estas magra vorto, amara vorto, por nekredanto; sed vi...! Ĉu vi ne lasos al Dio unu, du tagojn, la tutan tempon, kiun Li volos, por triumfigi justecon? La tempo apartenas al Li, kaj Li al ni promesis multege da ĝi! Renzo, lasu, ke Li mem faru; kaj sciu... vi ĉiuj sciu, ke mi jam havas enmane fadenon, por vin helpi. Ĉi-momente mi ne povas al vi diri plimulte. Morgaŭ mi ne alsupros ĉi tien; mi devas resti en la monakejo la tutan tagon, ĝuste por vi. Vi, Renzo, strebu veni tien; aŭ, se pro neatendita kaŭzo vi ne sukcesos, sendu fidindan homon, prudentan knabon, per kiu mi povu al vi sciigi, kion fari. Noktiĝas; mi devas rapidi al la monakejo. Kredon! kuraĝon! kaj adiaŭ».

Tion dirinte, li haste eliris, kaj foriris rapide, preskaŭ saltkure malsupren tra la malrekta kaj ŝtonoza pado, por ne atingi la monakejon malfrue, kun la risko ricevi akran

riproĉon, aŭ – aferon, kiu plimulte lin ĝenus – punon, kiu al li morgaŭ malebligus esti preta kaj libera por tio, kion la bezono de liaj protektatoj eventuale postulos.

«Ĉu vi aŭdis, kion li diris pri io... pri fadeno, kiun li havas, por nin helpi?» diris Lucia. «Konvenas fidi al li; li estas homo tia, ke kiam li promesas dek...». «Se ne estas alio...» interrompis Agnese. «Li devus paroli pli klare, aŭ apartigi min, kaj al mi diri, pri kio do temas».

«Babilaĵoj! Mi mem ĝin finos; ĝin finos mi!» interrompis ĉi-foje Renzo, irante tien kaj reen tra la ĉambro, kun tiaj voĉo kaj mieno, ke tute ne restis dubo pri la senco de tiuj vortoj.

«Ho Renzo!» elkriis Lucia.

«Kion vi intencas diri?» elkriis Agnese.

«Kial necesus diri? Mi mem ĝin finos. Eĉ se li havus cent aŭ mil diablojn en la animo, fine eĉ li konsistas el karno kaj ostoj...». «Ne, ne, pro amo al Dio...» komencis Lucia; sed la ploro interrompis ŝian voĉon.

«Tiaĵojn oni diru eĉ ne ŝerce!» diris Agnese.

«Ĉu ŝerce?» kriis Renzo, ekhaltante fronte al Agnese, kiu sidis, kaj rigardegante ŝin per du frenezaj okuloj. «Ĉu ŝerce! vi ja vidos, ĉu ŝerce».

«Ho Renzo!» pene diris Lucia, inter singultoj: «neniam mi vidis vin tia».

«Ne diru tiaĵojn, pro amo al Dio», haste reparolis Agnese, mallaŭtigante la voĉon. «Ĉu vi ne memoras kiam da brakoj tiu viro havas sub sia komando? Kaj eĉ se... Dio forigu!... kontraŭ malriĉuloj oni ĉiam faras justecon».

«Justecon faros mi, mi mem! Jam estas tempo. La afero ne estas facila: tion mi mem konscias. Li, la hundaĉo murdisto, certe sin gardas: li ja konscias, kiel li statas; sed ne

gravas. Rezolutesco kaj pacienco... kaj la momento alvenas. Jes, justecon faros mi: mi liberigos la lokon: kiom da homoj min benos...! kaj poste, per tri saltoj... for!». La hororo, kiun Lucia sentis ĉe tiuj pli klaraj vortoj, haltigis ŝian ploron, kaj havigis al ŝi forton por paroli. Levante el la manplatoj la larmo-plenan vizaĝon, ŝi diris al Renzo, kun voĉo afliktita, sed rezoluta: «al vi do ne plu gravas havi min edzino. Mi promesis min al Dio-tima junulo; sed viro, kiu farus... Eĉ se li estus sekura kontraŭ ĉia justico kaj venĝo, eĉ se li estus reĝido....». «Nu bone!» kriis Renzo, kun plej taŭzita mieno: «mi ne havos vin; sed eĉ ne li vin havos: mi ĉi tie sen vi, kaj li hejme de la...²». «Ha ne! pro karitato, ne diru tion, ne igu la okulojn tiaj: mi ne povas rigardi vin tia», elkriis Lucia, plorante, petegante, kunmetinte la manojn; dum Agnese ree kaj ree nomvokis la junulon, kaj al li palpis la ŝultrojn, la brakojn, la manojn, por lin kvietigi. Li restis kelkmomente senmova kaj enpena, kontemplante la pet-espriman vizaĝon de Lucia; poste li abrupte strab-rigardis ŝin, retropaŝis, etendis la brakon kaj la montro-fingron direkte al ŝi, kaj ekkriis: «ŝin! ja ŝin li volas! Li devas morti!». «Kaj kian malbonon mi faris al vi, por ke vi kaŭzu mian morton?» diris Lucia, dum ŝi sin ĵetis surgenuen antaŭ li.

«Vi!» li respondis, kun voĉ-tono, kiu esprimis ankoraŭ koleron, sed tute malsaman: «vi! Kian amon vi havas al mi? Kian pruvon vi al mi donis? Ĉu mi ne vin petegis, petegis, petegis? Kaj vi: ne! ne!». «Jes! jes», respondis impete Lucia: «mi venos al la pastro morgaŭ, aŭ eĉ nun, se vi volas; mi venos. Revenu al via antaŭa stato; mi venos».

«Ĉu vi promesas?» diris Renzo, kun voĉo kaj mieno

²hejme de la... diablo, t.e. en la infero.

subite denove pli humanaj.

«Mi promesas».

«Vi ĝin promesis».

«Di-Sinjoro, mi dankas vin!» elkriis Agnese, duoble kontenta.

Meze de tiu granda kolero, ĉu Renzo pensis, kion li profitos el la teruro de Lucia? Kaj ĉu li ne iom troigis, por ĝin kreskigi kaj elprofiti? Nia aŭtoro deklaregas, ke pri tio li nenion scias; kaj mi kredas, ke eĉ Renzo ne tute sciis. Fakte li vere furioziĝis kontraŭ Don Rodrigon, kaj samtempe li deziregis la konsenton de Lucia, kaj kiam du fortikaj pasioj kune kriegas en ies koro, neniu, eĉ ne la pasiulo mem, povas klare distingi unu voĉon disde la alia, kaj diri tutcerte, kiu el la duopo superas.

«Mi ĝin promesis», respondis Lucia kun timema kaj amoplena riproĉ-tono: «sed ankaŭ vi mem promesis ne estigi skandalojn kaj vin konfidi al patro Cristoforo...».

«Nu! Pro amo al kiu mi furioziĝas? Ĉu nun vi volas retropaŝi? Kaj ke mi faru misfaron?».

«Ne, ne», diris Lucia, kaj ŝi denove teruriĝis. «Mi promesis, kaj ne retropaŝas. Sed konsideru kiamaniere vi igis min promesi. Ne permesu Dio...».

«Kial vi volas mis-aŭguri, Lucia? Dio ja scias, ke al neniu ni malbonfaras».

«Almenaŭ promesu, ke ĉi tiu estos la lasta...».

«Mi ĝin promesas, kiel povra knabo».

«Sed ĉi-foje plenumu do», diris Agnese.

Ĉi tie la aŭtoro konfesas nescii alian aferon: ĉu Lucia vere estis tute malkontenta, ke ŝi estis devigita konsenti. Ni, same kiel li, lasas la aferon duba.

Renzo volus daŭrigi la interparolon, kaj detale difini, kion fari morgaŭ; sed estis jam nokto, kaj bonan nokton al li la virinoj bondeziris, ĉar ŝajnis al ili ne dece, se tiu-hore li restos pli longe.

Sed la nokto estis por la triopo tiel bona, kia ĝi povas esti post tago plena de ekscito kaj malfeliĉoj, kaj antaŭ tago destinita al entrepreno grava, kaj kun malcerta sukceso. Renzo reaperis frue, kaj interkonsentis kun la virinoj, aŭ pli ĝuste kun Agnese, la grandan vesperan operacon, laŭvice prezentante kaj solvante la malfacilojn, konjektante malhelpojn, kaj rekomencante, jen li, jen ŝi, priskribi la aferon, kiel oni rakontus jam okazintan eventon. Lucia aŭskultis; kaj, kvankam ŝi ne aprobis per parolo tion, kion ŝi ne povis aprobi en sia koro, ŝi tamen promesis, ke ŝi agos kiel eble plej diligente.

«Ĉu vi mem desupros al la monakejo, por paroli kun patro Cristoforo, kiel li al vi diris hieraŭ vespere?» demandis Agnese al Renzo.

«Tute neniel!» li respondis: «vi ja scias, kiajn diablajn okulojn havas la patro: li legus sur mia vizaĝo, kvazaŭ sur libro, ke io sekreta subestas: kaj se li komencus min pridemandi, mi ne sukcesus elturniĝi. Kaj krome, mi devas resti ĉi tie, por prizorgi la aferon. Estus pli bone, ke vi mem sendu iun».

«Mi sendos Menicon».

«Bone», respondis Renzo; kaj li foriris, por prizorgi la aferon, kiel li diris.

Agnese iris al najbara domo serĉi Menicon, kiu estis knabeto ĉirkaŭ dekdu-jara, speciale vigla, kaj kiu, tra kuzecoj kaj boparencecoj, estis preskaŭ ŝia nevo. Ŝi kvazaŭe lin prunte

petis je la gepatroj por la tuta tago, «por iu komisiono», ŝi diris. Ekhavinte lin, ŝi lin kondukis en sian kuirejon, donis al li matenmanĝon, kaj diris, ke li iru al Pescarenico kaj sin prezentu al patro Cristoforo, kiu ŝia-tempe resendos lin kun respondo.

«Patro Cristoforo, vi ja scias, tiu bela oldulo kun blanka barbo, kaj oni lin nomas la sanktulo...». «Mi komprenis», diris Menico: «tiu kiu ĉiam karesas nin, la infanojn, kaj foje al ni donas sanktajn bildetojn».

«Ĝuste, Menico. Kaj se li al vi diras, ke vi atendu momente apud la monakejo, ne delokiĝu: evitu iri kun kamaradoj al la lago, por vidi fiŝkapti, aŭ por ludi per la fiŝretoj kroĉitaj al muroj por sekigo, aŭ por fari vian alian kutiman ludeton...». Oni sciu, ke Menico estis tre lerta glit-saltiĝi ŝtonetojn sur la lago-supraĵo; kaj estas ja sciate, ke ni ĉiuj, etaj kaj grandaj, volonte faras la aferojn, pri kiuj ni lertas; mi ne diras: nur tiujn aferojn.

«Pu! onjo; mi ne estas knabo».

«Bone, vi prudentu; kaj kiam vi revenos kun la respondo... vidu: ĉi tiuj du belaj novaj groŝoj estas por vi».

«Donu ilin nun, ĉar estas tut-egale».

«Ne, ne, vi forludus ilin. Iru, kaj konduku bone; kaj vi ricevos eĉ pli multe».

Dum la cetera tempo de tiu longa mateno, vidiĝis novaĵoj, kiuj ne ete suspektigis la jam ekscititan animon de l' virinoj. Almozulo, nek mizerega nek ĉifonega³ kiel liaj samsortanoj, kaj kun aspekto iel obskura kaj sinistra, eniris almozpete, ĉirkaŭrigardante per spionecaj okuloj. Oni al li donis pan-pecon, kiun li ricevis kaj ensakigis kun nekaŝita indiferento.

³ *ĉifonega*: kun vestoj tre ŝiritaj.

Poste li haltetis, iel senhonte, kaj samtempe hezite, farante multajn demandojn, al kiuj Agnese ĉiufoje rapidis respondi malvere. Ekforirante, li ŝajnis maltrafi la ĝustan pordon, kaj eniris tra tiu, kiu kondukis al la ŝtuparo, kaj ankaŭ tien li rapide rigardis, laŭpove. Kiam oni al li alkriis: «He, he, kien vi iras, bona homo? ĉi tien! ĉi tien!» li retropaŝis, kaj eliris tra la direkto al li montrata, senkulpigante sin kun afektaj submetiĝoj kaj humileco apenaŭ konvenaj al la malmildaj trajtoj de lia vizaĝo. Post li, aliaj strangaj figuroj plu aperis de tempo al tempo. Ne estis facile diri, kiaj ili estas; sed samtempe ne kredeblis, ke ili estas la honestaj vojaĝantoj, kiaj ili sin afektis. Unu eniris pretekste demandi vojo-indikojn, aliaj, pasante antaŭ la pordo, malrapidiĝis, kaŝrigardis trans la korto en la ĉambron, kvazaŭ por rigardi sen suspektigi. Fine, ĉirkaŭ tagmezo, tiu ĝena procesio ĉesis. Agnese de tempo al tempo leviĝis, transiris la korton, elmetis la kapon tra la pordego, rigardis dekstren kaj malen, kaj revenis dirante: «neniu»: vorton kiun ŝi plezure diris kaj Lucia plezure aŭdis, malgraŭ tio, ke neniu el la duopo sciis la kialon de tio. Sed en ambaŭ restis ia maltrankvilo, kiu forprenis de ili, precipe de la filino, grandan parton de la kuraĝo, per kiu ili sin provizis por la vespero.

Sed konvenas, ke la leganto eksciu ion pli precizan koncerne tiujn misterajn vagantojn; kaj, por lin informi pri ĉio, ni devas retro-paŝi, kaj retrovi Don Rodrigon, kiun hieraŭ ni lasis sola en salono de lia domo, ĉe l' foriro de patro Cristoforo.

Don Rodrigo, kiel ni diris, longa-paŝe trairis tien kaj reen tiun salonon, ĉe kies vandoj pendis plur-generaciaj familiaj portretoj. Ĉiufoje kiam li troviĝis vizaĝ-al-mure kaj returniĝis,

li fronte vidis unu el siaj prapatroj: militiston, teruron de l' malamikoj kaj de liaj soldatoj, strab-rigardan, kun kurtaj, hirtaj haroj, kun lipharoj streĉitaj kaj pintaj, elstaraj el la vangoj, kun oblikva mentono: la heroo staris kun krur-ingo, kun femur-ingo, kun kiraso, kun brak-ingo, kun gantoj, ĉio el fero; kun la dekstra mano sur la flanko kaj la maldekstra sur la glav-pomelo. Don Rodrigo lin rigardis; kaj kiam li alvenis sub lin kaj sin returnis, jen fronte alia prapatro: juĝisto, teruro de l' kverelantoj kaj de l' pledistoj, sidanta sur seĝego tegita per ruĝa veluro; envolvita en ampleksa nigra togo; tute nigra, escepte de blanka kolumo kun du larĝaj tol-strioj kaj kun roverso el zibelaĵo⁴ (ĝi estis distingilo de l' senatanoj; kiuj ĝin surportis nur vintre, tiel ke neniam troviĝos portreto de senatano en somera vestaĵo); senkarna, kun la brovoj kuntiritaj: li tenis enmane peticion⁵, kaj li aspektis kvazaŭ diri: ni vidos. Ĉi tie matrono⁶, teruro de siaj ĉambristinoj; tie abato, teruro de siaj monakoj: entute ĉiuj homoj, kiuj siatempe estigis teruron, kaj ankoraŭ elspiris ĝin el la tol-pentraĵoj. Fronte al tiaj memoraĵoj, Don Rodrigo des pli iritiĝis, hontiĝis, ne povis kvietiĝi, pro tio ke monako aŭdacis lin ataki, kun la aplombeco de Nathan⁷. Jen li kunmetis venĝo-planon, jen li ĝin forlasis; li cerbumis, kiel kontentigi samtempe sian pasion kaj tion kion li nomis honoro; kaj foje (nu vidu!) aŭdante ankoraŭ zumi ĉe-orele tiun aŭgur-komencon, li sentumis tim-

⁴ *roverso el zibelaĵo*: kolum-refaldo el pelto de zibelo, malgranda mamulo kun valora felo.

⁵ *peticion*: skribitan peton.

⁶ *matrono*: grava senjorino.

⁷ *Nathan*: profeto, kiu laŭ la Biblio aŭdacis riproĉegi reĝon David pro liaj pekoj.

tremojn, kaj preskaŭe li volis rezigni la intencon pri ambaŭ kontentigoj. Fine, nur por ion fari, li vokis serviston kaj al li ordonis senkulpigi lin ĉe la kunularo, dirante, ke lin retenas urĝaĵo. Kiam la servisto revenis, raportante, ke tiuj senjoroj jam foriris, lasinte siajn respekt-esprimojn: «Kaj kio pri grafo Attilio?», demandis Don Rodrigo, plu marŝante.

«Li foriris kun tiuj senjoroj, eminentega».

«Bone: ses eskortanojn, por la promeno: tuj! Glavon, mantelon, ĉapelon: tuj!».

La servisto respondis per sinklino kaj foriris; post nemulte li revenis portante la luksan glavon, kiun la mastro alzonigis; la mantelon, kiun li al si ĵetis surŝultren; la ĉapelon ornamitan per grandaj plumoj, kiun li surmetis kaj per kruda manbato premaĉis surkapen: signo de tempestaĉo. Li ekiris, kaj ĉe l' pordego li trovis la ses anaĉojn, tute armitajn, kiuj, forminte spaliron kaj farinte sinklinon, ekiris post lin. Pli moroza, pli supereca, pli sulk-brova ol kutime, li eliris promene direkte al Lecco. La kampuloj, la metiistoj, vidante lin veni, retiriĝis tuŝe al muro, kaj de tie ili faris lia-direkte senĉapeliĝojn kaj profundajn sinklinojn, al kiuj li ne respondis. Kiel subranguloj, al li kliniĝis eĉ tiuj, kiujn kampuloj kaj metiistoj nomis senjoroj; ĉar en la tuta ĉirkaŭaĵo, distance de mil mejloj, neniu estis, kiu povis rivali kun li rilate nomon, riĉaĵojn, aliancojn, kaj emon elprofiti ĉi-ĉion, por superi la aliulojn. Al ĉi-lastaj li salut-respondis degno-miene. Tiun tagon ne okazis, sed ĉe eventuala renkontiĝo kun la hispana senjoro kastelestro, la sinklino estis ambaŭflanke same profunda; kvazaŭ afero inter du potencoj, kiuj havas nenion por reciproke partopreni, sed, pro oportuneco, unu honoras la rangon de la alia. Por iom forigi la koleregon, kaj kontraŭmeti imagojn tute diferencajn

ol pri la kapuceno, kiu obsedis lian fantazion, Don Rodrigo tiun tagon eniris domon kutime vizitatan de multe da viroj, kie oni lin akceptis kun la zorgo-plena kaj respektema elkoreco, kiajn oni kutime rezervas al la viroj, kiuj igas sin aŭ multe ami aŭ multe timi; kaj de tie li revenis al sia domo, kiam jam tute noktiĝis. Ankaŭ grafo Attilio estis ĵus reveninta; kaj oni surtabligis la vespermanĝon, dum kiu Don Rodrigo restis daŭre enpenso, kaj malmulte parolis.

«Kuzo, kiam vi pagos la vetaĵon?» diris grafo Attilio kun malica kaj moka mieno, tuj kiam, post detabligo, la servistoj foriris.

«Ankoraŭ ne forpasis la tago de sankta Marteno».

«Egale, se vi pagas nun; ĉar forpasos ĉiuj kalendar-sanktuloj, antaŭ ol...».

«Pri tio, oni vidos».

«Kuzo, vi volas diplomatumi; sed mi ĉion komprenis, kaj mi tiom certas pri mia vet-gajno, ke mi pretas fari eĉ duan veton».

«Mi aŭdu».

«Ke patro... patro... kiel do li nomiĝas? Entute: tiu frataĉo konvertis vin».

«Jen unu el viaj fantaziaĵoj».

«Konvertis, kuzo; konvertis, mi diras. Mia-flanke, mi ĝojas. Vi sciu, ke estos bela spektaklo, vidi vin tute pentema, kun mallevitaj okuloj! Kaj kia gloro por tiu patro! Supozeble, kiel fiera kaj pufa li revenis hejmen! Tiajn fiŝojn oni ne kaptas ĉiutage, kaj ne per ĉiaj retoj. Ja certu, ke li citos vin kiel ekzemplon; kaj kiam li misios iom malproksime, li mencios vian aferon. Mi imagas aŭdi lin». Ĉe tio grafo Attilio daŭrigis predik-tone, kun nazala intonacio, kaj akompanante la vortojn

per karikaturaj gestoj: «En regiono de tiu ĉi mondo, kiun pro konvena respekto mi ne mencias, vivis, karegaj aŭskultantoj, kaj ankoraŭ vivas, sen-brida kavaliro, pli amanto de inoj ol de bon-moruloj, kiu, kutima kunmeti el ĉia herbo garbon, okulumis...».

«Sufiĉe, sufiĉe», interrompis Don Rodrigo, duon-ridaĉe kaj duon-ĝenate. «Se vi volas duobligi la veton, ankaŭ mi mem estas preta».

«Diable! Ĉu eble vi mem konvertis la patron?».

«Pri tiu viro al mi ne parolu: koncerne la veton, decidis la sankt-Marten-tago». La scivolo de la grafo estis ekscitita; li ne domaĝis demandojn, sed Don Rodrigo sukcesis eskapi el ĉiuj, daŭre prokrastante ĝis la decido-tago, kaj ne volante komuniki al la kontraŭa partio siajn planojn, kiuj estis nek entreprenitaj nek tute difinitaj.

La postan matenon Don Rodrigo vekiĝis kiel vera Don Rodrigo! Jam tute malaperis, kune kun la noktaj songoj, la angoro, kiu ĉe la vortoj *venos tago*, ekobsedis lin, kaj en li restis nur koler-sento, akrigita de la honto pri tiu momenta senforteco. La pli ĵusaj memoroj pri la triumfeca promeno, pri la riverencoj, pri la akcepto, kaj la moko de l' kuzo ne ete kontribuis redoni al li la iaman spiriton. Post kiam li leviĝis, li tuj ordonis venigi la Grizulon. – Gravegaj aferoj, – diris en si mem la servisto ĉe tiu ordono; ĉar la viro kun tiu alnomo estis eĉ la ĉefbravulo, la viro al kiu oni kutime trudis la entreprenojn plej riskajn kaj krimajn, la plej fidinda je l' mastro, la viro al li tute sindona, pro dank-sento kaj intereso. Iam, farinte murdon dumtage sur publika placo, la Grizulo venis petegi protekton de Don Rodrigo; ĉi-lastata vestis lin per sia livreo, kaj per tio ŝirmis lin kontraŭ ĉia enketo de la

justico. Tiele, sin devigante plenumi ĉian ordonotan krimon, la viro al si garantiis senpunecon pri la unua. Por Don Rodrigo tio estis ne malgrava akiro, ĉar la Grizulo, krom tio ke li estis senkompare la plej brava el lia tuta anaro, ankaŭ pruvis kiom multe lia mastro sukcesas atenci leĝojn, tiamaniere ke lia potenco pligrandiĝis kaj fakte kaj opinie.

«Grizulo!» diris Don Rodrigo: «en tiu ĉi okazo evidentiĝos, kiom vi bravas. Antaŭ morgaŭ tiu Lucia devas troviĝi en tiu ĉi palaco».

«Neniam direblis, ke la Grizulo retiriĝis de ordono de l' eminentega sinjoro mastro».

«Venigu kun vi kiom da viroj vi povas bezoni, ordonu kaj dispoziciu laŭ via bontrovo; kondiĉe ke la afero sukcesu feliĉe. Sed ĉefe gardu, ke oni tute ne faru al ŝi malbonon».

«Sinjoro, iom da teruro, por ke ŝi ne faru tro da bruoj... ne estos evitebla».

«Teruro... mi komprenas... ne estas evitebla. Sed oni al ŝi eĉ ne tordu haron; kaj ĉefe oni ĉiumaniere ŝin respektu. Ĉu vi komprenis?». «Sinjoro, ne eblas pluki de arbo floron, kaj ĝin porti al via moŝto, ne tuŝante ĝin. Oni tamen faros nur-nure kiom necesas».

«Sub via garantio! Kaj... kiel vi faros?». «Mi estas pripensanta, sinjoro. Bonŝance, ke ŝia domo situas ĉe l' rando de la vilaĝo. Ni bezonas embuskejon: kaj ĝuste ne distance de tie staras tiu ne-loĝata, izola domaĉo, meze de l' kampoj, tiu domo... verŝajne pri ĉi-aferoj via moŝto nenion scias... domo, brulinta antaŭ kelke da jaroj, kaj oni ne havis monon por ĝin rebonigi, kaj ĝi estas forlasita, kaj nun ĝin vizitas sorĉistinoj:

sed hodiaŭ ne estas sabato⁸, kaj krome mi primokas tiaĵojn. Ĉi-tieaj kampuloj, plenaj de superstiĉoj, en nenia semajno-nokto ĝin vizitaĉus, eĉ kontraŭ la tutmonda oro: tiel ke ni povas tie posteni, sekure ke neniu venos fuŝi niajn aferojn».

«Bone; kaj kio poste?». Ĉe tio jen la Grizulo proponis, jen Don Rodrigo pridiskutis, ĝis interkonsenta plano pri l' maniero plenumi la entreprenon ne lasante spurojn pri la farintoj; kaj la maniero deturni la suspektojn ali-direkten per falsaj indicoj; silentigi la povran Agnese-n; eksciti en Renzo tiom da teruro, ke malaperu en li la ĉagreno kaj la intenco fari denuncon al la justico, kaj eĉ la emo plendi; kaj ĉiujn ceterajn friponaĵojn, necesajn por sukcesigi la ĉefan. Ni evitas raporti tiujn kunplanojn, ĉar, kiel la leganto mem konstatos, ili ne estas necesaj por kompreni la okazintaĵon; kaj ankaŭ ni mem ĝojas, ke ni ne devas pli longe aŭdigi la intertraktadon de l' du abomenindaj kanajloj. Sufiĉas aldoni, ke dum la Grizulo foriris plenumi la aferon, Don Rodrigo lin revokis kaj al li diris: «aŭdu: se tiu aĉa temerarulo trafus ĉi-vespere en viajn ungegojn, ne estus malbone antaŭ-bati liajn ŝultrojn por trafa averto. Tiel ke la ordono silenti, kiun li morgaŭ ricevos, havos pli certan efikon. Sed ne serĉu lin, por ne fuŝi la ĉefan aferon: vi min komprenas».

«Lasu la aferon al mi», respondis la Grizulo, sin klinante, kun gesto samtempe omaĝa kaj fanfarona; kaj li foriris. Oni pasigis la matenon zigzagante, por esplori la vilaĝon. La falsa ĉifonulo, tiel penetranta en la malriĉan dometon, estis ĝuste la Grizulo, veninta por konstati propra-okule ĝian dispozicion; la falsaj vojaĝantoj estis liaj anaĉoj, al kiuj, por agi sub lia

⁸ *sabato*: laŭ superstiĉaj popolaj kredaĵoj, en sabataj tagoj sorĉistinoj faras orgiajn kunvenojn.

komando, sufiĉis pli ĝenerala kono de la loko. Post tiu esploro, ili malaperis, por ne suspektigi tro multe.

Kiam ĉiuj esplorantoj revenis al la palaco, la Grizulo faris raporton, kaj fin-planis la entreprenon; li disdonis taskojn kaj instrukciis. Ĉio tio ne fareblis, sen ke la maljuna servisto, kiu restis kun malfermitaj okuloj kaj streĉitaj oreloj, ekvidus, ke oni mahinacias ion gravan. Per atentado kaj demandado; kaptante duonan sciigon ĉi tie kaj duonan tie, komentante en si mem malklaran vorton, interpretante mister-plenan iron, tiom multe li klopodis, ke fine al li klariĝis, kio do estas planita por la venonta nokto. Sed kiam li sukcesis tion kompreni, la nokto estis jam proksima, kaj eta avangardo da bravuloj jam iris embuski en tiu ruiniĝinta domaĉo. La kompatinda oldulo, kvankam konscia, kian riskan ludon li ludas, kaj ankaŭ kun timo, ke li alportos helpon tro malfruan, tamen ne volis manki: li eliris, pretekste fari promeneton, kaj tute haste li sin direktis al la kapucenejo, por laŭpromese sciigi patron Cristoforo. Post nemulte ekiris la aliaj bravuloj, kiuj desupris dise, por ne aspekti societo; la Grizulo venis pli poste; postrestis nur unu port-seĝo, portota al la domaĉo malfru-vespere; kio fakte okazis. Post kiam ili kolektiĝis en tiun lokon, la Grizulo sendis tri el ili al la drinkejo de l' vilaĝeto: el ili unu starigu sin ĉe l' enirpordo, por observi, kio do okazas surstrate, kaj kontroli, kiam do la loĝantoj enhejmiĝis; kaj la du ceteraj restu interne de l' drinkejo, por ludi kaj drinki kvazaŭ amuziĝantoj; kaj dume esplori, ĉu io esplorindas. Li mem, kun la ĉefa taĉmento, restis atende en la embuskejo.

La povra maljunulo ankoraŭ trotumis; la tri esplorantoj atingis la drinkejon; la suno estis subiranta; kiam Renzo eniris ĉe l' du virinojn kaj diris: «Tonio kaj Gervaso min atendas

ekstere; mi iras kun ili al la drinkejo por vespermanĝeto; kiam sonoriloj signalos anĝeluson⁹, ni venos, por konduki vin kun ni. Nu kuraĝe, Lucia! Ĉio dependas de unu momento». Lucia suspiris, kaj ripetis: «Kuraĝe», kun tono, kiu malkonfirmis la vorton.

Kiam Renzo kun la kunuloj atingis la drinkejon, ili trovis jam gardo-stara tiun ulon, kiu duon-okupis la enirejon, kun la dorso apogita al unu pordo-fosto, kun la brakoj krucitaj surbruste; kaj re- kaj refoje rigardis dekstren kaj malen, briligante jen la blankon jen la nigron de siaj falkeskaj okuloj. Plata, velura ĉapo karmezin-kolora,¹⁰ oblikve surmetita, al li duon-kovris la har-tufon, kiu, dividite sur la sombra frunto, turniĝis ambaŭflanken sub la oreloj, kaj finiĝis per plektaĵoj fiksitaj sur-nuke per kombilo. Li pende tenis en mano dikan bat-bastonon; verajn armilojn li malkaŝe ne surportis; sed nur rigardante lian mienon, eĉ infano konjektus, ke sube li certe havas da ili kiom multe li povas kaŝi. Kiam Renzo, kiu antaŭis la aliajn, estis ĉe l' eniro, tiu viro, tute ne flankiĝante, lin rigardis tute fikse; sed la junulo, strebante eviti ĉian diskuton, kiel faras ĉiu, kiu havas ĉe-mane malglatan aferon, ŝajnis ne rimarki lin; li eĉ ne diris: «Flankiĝu»; kaj, tuŝe al la alia pordo-fosto, li pasis flank-antaŭen, tra la aperturo liber-lasita de tiu kariatido¹¹. La du kunuloj devis fari la saman manovron, se voli eniri. Enirinte, ili vidis la aliajn, kies voĉojn ili jam aŭdis: tio estas, tiujn du bravulaĉojn, kiuj, side ĉe tablo-

⁹ *anĝeluson*: sonoriladon, kiu anoncas katolikan preĝadon matene, tagmeze kaj vespere.

¹⁰ *karmezin-kolora*: brile malhelruĝa.

¹¹ *kariatido*: kolono en formo de hom-statuo.

angulo, ludis moraon¹², kriante ambaŭ samtempe (ĉi-kaze la ludo mem tion postulas), kaj laŭvice ili al si reciproke englasigis vinon el dika flasko, kiu staris inter ili. Ankaŭ ili mem fiks-rigardis la novan societeton; kaj precipe unu el la duopo, tenante unu manon levita, kun tri fingraĉoj streĉitaj kaj disaj kaj kun la buŝo ankoraŭ malfermita, pro laŭta «ses!» tiumomente eksplodigita, esplor-rigardis Renzon ĝisplande; poste li okulumis al sia kompano kaj poste al tiu ĉe la pordo, kiu respondis per kap-gesto. Renzo suspekto kaj hezite rigardis siajn du invititojn, kvazaŭ por esplori en iliaj mienoj interpreton pri ĉiuj-ĉi signoj; sed la mienoj nenion esprimis krom bonan apetiton. La drinkejestro rigardis lian vizaĝon, kiel atendente mendon: Renzo lin venigis en apudan ĉambron, kaj mendis vespermanĝon.

«Kiu estas tiuj fremduloj?» demandis poste Renzo mallaŭte, kiam la drinkejestro revenis kun kruda tablo-tuko sub-brake, kaj vin-flasko en-mane.

«Mi ne konas ilin», li respondis, disfaldante la tablo-tukon.

«Kiel? Ĉu eĉ ne unu el ili?». «Vi ja scias», li denove respondis, gladumante ambaŭ-mane la tukon sur la tablo, «ke unua regulo de nia metio estas: ne demandi pri alies aferoj: tiel ke eĉ niaj virinoj ne estas scivolaj. Aliflanke, konsidere l' amason da homoj, kiuj iras-reiras, oni estus aĉe aranĝita! Ĉi-tie ĉiam estas kvazaŭ mar-haveno, mi aludas la tempon, kiam la jar-rikoltoj estas laŭdevaj; sed ni gaju, ĉar prospera tempo ja revenos. Al ni sufiĉas, ke la gastoj estu honestaj; sed tute ne gravas, kio do ili estas aŭ ne estas. Kaj nun mi al vi portos

¹²*moraos*: ludo en kiu la ludantoj devas diveni la sumon de la fingroj kiujn ĉiuj rapide elstreĉas en la sama momento.

pladon da viando-buloj tiaj, kiajn vi neniam gustumis.

«Kiel vi povas scii...?» reparolis Renzo; sed la drinkejestro, jam turnite al la kuirejo, daŭrigis sian iron. Kaj tie, dum li prenis la kuirujon kun la menciitaj viand-buloj, al li senbrue apudiĝis tiu bravulaĉo, kiu estis esplor-rigardinta nian junulon, kaj al li diris mallaŭte: «Kiuj estas tiuj honestuloj?». «Bonaj homoj, el ĉi-vilaĝo», respondis la drinkejestro, surpladigante la viand-bulojn.

«Bone; sed kiel ili nomiĝas? kiuj ili estas?» li insistis kun krudeta voĉo.

«Unu nomiĝas Renzo», respondis la drinkejestro, same mallaŭte: «bona, saĝ-kapa junulo; silko-ŝpinisto tre lerta en sia metio. La alia estas kampulo, nome Tonio: bona, gaja kompano: domaĝe ke li havas malmulte da mono; ĉar li forelspezus ĝin ĉi tie. La tria estas povra sentaŭgulo, kiu tamen ŝatas manĝi, kiam oni al li donas. Mi pardonpetas».

Kaj, per lerta ekpaŝo, li elturniĝis elinter la kuirforno kaj la demandanto; kaj iris alporti la pladon laŭdeve. «Kiel vi povas ekscii», reparolis Renzo, vidante lin reaperi, «ke ili estas honestuloj, se vi ne konas ilin?». «La faroj, mia kara: oni rekonas homon el faroj. La homoj, kiuj trinkas la vinon, ne kritikante ĝin; kiuj pagas la konton senmarĉande; kiuj ne estigas kverelojn kun aliaj klientoj, kaj, se intenci piki onin per tranĉilo, atendas lin ekstere, for de la drinkejo, tiel ke ili ne enmiksas la povran drinkejestrone: jen la honestuloj. Tamen, se interkoni sin intime, kiel nia kvaropo, des pli bone. Sed kial diable vi emas ekkoni tiom da aferoj, estante nov-edzo, kaj certe kun tute aliaj pensoj en la kapo? kaj antaŭ tiuj ĉi viand-buloj, kiuj revivigus eĉ mortinton?». Tion dirante, li revenis en la kuirejon.

Nia aŭtoro, rimarkante lian diversan manieron respondi la demandojn, diras, ke tia homo en ĉiuj siaj paroloj, sin deklaris tre amika de l' honestuloj ĝenerale; sed praktike li estis ege pli komplezema al tiuj kiuj famis aŭ aspektis kiel friponoj. Kurioza karaktero! ĉu ne?

La vespermanĝo ne estis tre gaja. La du invititoj emis ĝin traĝui tute senurĝe; sed la invitinto, zorgo-plena pri tio kion la leganto scias, kaj ĝenite kaj iom ekscitite pro la stranga konduto de tiuj nekonatoj, sopiregis la momenton foriri. Kaŭze de tiuj homoj, oni parolis mallaŭte, per stumpaj kaj ne spontanaj vortoj.

«Kia bela afero», abrupte elbuŝigis Gervaso, «ke Renzo volas edziĝi, kaj li bezonas...!». Renzo al li turnis bruskan¹³ mienon. «Ĉu vi ne silentas, bestaĉo?» al li diris Tonio, akompanante la alnomon per kubut-bato. La interparolo iĝis pli kaj pli malvarma, ĝisfine. Renzo, restante sopra ĉu manĝe ĉu drinke, zorgis englasigi vinon por la du atestantoj, kun diskreteco, por al ili doni iom da verovo, ne forigante tamen ilian cerbon. Post detabligo, kaj konto-pago fare de tiu kiu malplimulte konsumis, la triopo devis denove pasi antaŭ tiuj aĉaj vizaĝoj, kiuj denove turniĝis al Renzo, kiel ĉe lia eniro. Post kelke da paŝoj ekster la drinkejo, Renzo retrorigardis, kaj vidis ke la duopo, kiun li lasis sidanta en la kuirejo, sekvas lin: tiam li ekhaltis kun siaj kunuloj, kvazaŭ dirante: ni vidu, kion do ili volas pri mi. Sed la du viroj, ekvidinte sin rigardataj, ekhaltis ankaŭ ili mem, mallaŭte interparolis, kaj returnis sin. Se Renzo proksimus sufiĉe, por aŭdi iliajn vortojn, li trovus ilin tute strangaj: «Al ni estus ja honoro, ne menciante pri trink-mono», diris unu el la fiuloj, «se, reveninte al la palaco,

¹³ *bruskan*: malmildan, akre malĝentilan.

ni povus raporti, ke ni tute rapide al li rektigis la ripojn; kaj tio per ni mem, sen ĉeesto kaj regado de sinjoro Grizulo».

«Kaj per tio fuŝi la ĉefan aferon!» respondis la alia. «Jen: ili rimarkis ion; li ekhaltas por nin rigardi. He! Se estus pli malfrue! Ni retroiru, por ne suspektigi. Vi ja vidas, ke venas homoj ĉiuflanke: ni atendu ke ĉiuj revenos al siaj kokinejoj!». Okazis fakte tia svarmetado, tia zumado, kiu aŭdiĝas vespere en vilaĝo, kaj kiu post ne multe cedas al solena nokta kvieto. La virinoj revenis el la kampoj, brak-portante la infanojn, kaj man-kondukante la pli grandetajn, al kiuj ili recitigis la vesperajn preĝojn; revenis la viroj, kun la fosiloj kaj pioĉoj surŝultre. Ĉe l' malfermo de l' dompordoj, ĉi tie kaj tie oni vidis ekbrili fajrojn, brulantajn por malriĉaj vespermanĝoj; surstrate aŭdiĝis reciprokaj salutoj, kaj kelke da vortoj pri la magra rikolto kaj la mizero de tiu jaro; kaj, pli ol la vortoj, aŭdiĝis la ritmaj reeĥaj batoj de l' sonorilo, kiu anoncis la tago-finon. Renzo, vidinte ke la du maldiskretaj homoj retiriĝis, daŭrigis sian iron tra la pliiĝanta mallumo, renovigante mallaŭte jen unu jen alian admonon jen al unu jen al la alia frato. Ili atingis la dometon de Lucia, kiam estis jam nokto.

Inter ekpenso pri terura faro kaj ties plenumo (diris ne sengenia barbaro¹⁴) la intertempo estas sonĝo plena de fantomoj kaj timegoj. Lucia jam de multe da horoj suferis la angorojn de tia sonĝo: kaj Agnese, eĉ Agnese, kiu estis elpensinta la konsilon, estis zorgoplena, kaj apenaŭ trovis

¹⁴*ne sengenia barbaro*: t.e. W. Shakespeare, en *Julio Cezaro*, a. 11, sc. 1. Manzoni, kiu apartenis al la romantika movado, aludas ironie la polemikon de la klasikuloj de sia epoko, kiuj difinis la romantikulojn (inter kiuj ili klasifikis Ŝekspiron) kiel barbarojn.

vortojn por kuraĝigi la filinon. Sed ĉe l' vekiĝo, tio estas ĉe l' efektivigo, la animo sentas sin tute ŝanĝita. Post la teruro kaj la kuraĝo, kiuj interbatalis en la animo, sekvas alia teruro kaj alia kuraĝo: la entrepreno sin prezentas al la menso kvazaŭ nova aperaĵo: foje tio kio ĵus plejmulte teruris, subite ŝajnas facila; alfoje aspektas granda la obstaklo antaŭe apenaŭ konsiderita; la imago retropaŝas konsternite; la korpo-membroj ŝajnas malobei; kaj la koro malkonfirmas plej firmajn promesojn. Ĉe l' mallaŭta pordo-frapo de Renzo, Lucia-n ekkaptis tia teruro, ke tiumomente ŝi rezolutis suferi ĉion ajn, resti por ĉiam for de li, prefere ol plenumi tiun decidon; sed kiam li montris sin, kaj diris: «Jen mi, ni iru», kiam ĉiuj sin montris senhezite pretaj ekiri, kiel por senrevoke fiksita afero; Lucia havis nek tempon nek forton por kontraŭdiri kaj, kvazaŭ trenate, kaptis tremante unu brakon de la patrino kaj unu de la promes-edzo, kaj ekiris kune kun la aventurema kompanio.

Tute silente, en mallumo, kun modera paŝado, ili eliris de la dometo, kaj ekiris vojon eksteren de la vilaĝo. Pli mallonge estus trairi la vilaĝon mem, ĉar tiel oni alirus rekte al la domo de Don Abbondio, sed ili elektis tiun alian vojon, por ne vidiĝi. Tra padoj, inter legom-ĝardenoj kaj kampoj, ili alvenis proksime al tiu domo, kaj tie ili disiĝis. La du promes-geedzoj restis kaŝite malantaŭ la angulo de la domo; Agnese kun ili, sed iom pli antaŭe, por ĝustatempe alkuri, haltigi kaj ekkapti Perpetua-n; Tonio, kune kun la senmensa Gervaso – kiu per si mem scipovus fari nenion, kaj sen kiu oni nenion povus fari – brave sin prezentis al la pordo kaj frapetis.

«Kiu estas ĉi-hore?» kriis voĉo el malfermiĝanta

fenestro: estis la voĉo de Perpetua. «Da malsanuloj¹⁵ ne estas, laŭ mia scio. Ĉu eble okazis akcidento?». «Estas mi», respondis Tonio, «kun mia frato, bezonantaj paroli kun la respektinda pastro».

«Ĉu ĉi tio estas kristan-konvena momento?» ekdiris krude Perpetua. «Kia diskreteco? Revenu morgaŭ».

«Aŭskultu: mi revenos aŭ ne revenos: mi ĵus enpoŝigis iom da mono, kaj mi venis pagi tiun ŝuldeton, kiun vi scias. Mi kunhavas dudek kvin belajn novajn monerojn; sed se ne eblas, paciencon: mi ja scias, kiel ilin elspezi. Mi revenos, kiam mi estos kolektinta aliajn».

«Atendu, atendu: mi iras kaj tuj reiras kun respondo. Sed kial veni ĉi-hore?». «Ankaŭ mi mem ricevis ilin ĵus-tempe; kaj mi ekpensis ke, se mi tranoktigas ilin ĉe mi, mi ne scias, kion mi opinios morgaŭ matene. Tamen, se la horon vi ne ŝatas, mi ne scias, kion diri; miaflanke, mi ĉeestas; se vi ne volas min, mi foriras».

«Ne, ne, atendu momente: tuj mi revenos kun respondo». Tion dirante, ŝi refermis la fenestron. Ĉi-momente Agnese disiĝis de l' promes-geedzoj, kaj flustrinte al Lucia: «kuraĝe; temas pri momenteto; estas kvazaŭ oni eltirus denton», ŝi kuniĝis kun la du fratoj antaŭ la pordo; kaj ekbabilis kun Tonio, tiel ke Perpetua, venante malfermi, kredu ke hazarde ŝi tien trafis, kaj ke Tonio ŝin haltigis pormomente.

¹⁵ *malsanuloj*: okaze de morto-danĝero oni rajtas venigi pastron ĉiahore, por ke li preĝu.

VIII

– Karneado!¹ Kiu do li estis? – remaĉis en si mem Don Abbondio, sidante sur sia seĝego en ĉambro de la supra etaĝo, kun malfermita libreto antaŭ si, kiam eniris Perpetua kun la mesaĝo. – Karneado! ja ŝajnas al mi, ke ĉi-nomon mi jam legis aŭ aŭdis; temas certe pri klerulo, pri granda literatoro de la antikva tempo: la nomo apartenas al tiaj; sed kiu diable estis tiu homo? – Tiom multe la povrulo estis for de la prognozo, pri kia tempestego amasiĝas super lia kapo!

Oni sciu, ke Don Abbondio ŝatis legi iomete ĉiutage; kaj najbara parokestro, kiu havis etan bibliotekon, al li pruntis libron post libro: la unuan kiu trafis en liajn manojn. La libreto, super kiu meditis tiumomente Don Abbondio, tiam konvaleskanta el la febro de l' timego, verdire pli resaniĝinta (koncerne febron) ol kiom li volus kredigi, estis panegiro honore al sankta Karlo, tre bombaste deklamita kaj tre admire aŭskultita antaŭ du jaroj en la katedralo de Milano. La oratoro komparis la sanktulon unue kun Arkimedo, pro ties fervoro por kulturo; kaj tie Don Abbondio ne stumblis; ĉar Arkimedo faris tiajn kuriozaĵojn, kaj tiom multe sin famigis, ke ne bezonatas tre vasta erudicio, por iom scii pri li. Sed post Arkimedo, la aŭtoro citis por komparo ankaŭ Karneadon: kaj tie la leganto restis grundinte. En tiu momento eniris Perpetua, por anonci la viziton de Tonio.

«Ĉu nun-hore?» diris, memkompreneble, ankaŭ Don Abbondio.

«Kion diri? Oni ne havas diskretecon: sed se vi ne kaptas lin ĉe-momente...».

«Jes ja: se mi ne kaptas lin nun, neniuj scias, kiam do mi

¹ *Karneado*: helena filozofo kaj oratoro.

povos lin kapti! Enkonduku lin... He! he! Ĉu vi certas, ke temas ĝuste pri li?».

«Diable!» respondis Perpetua, kaj ŝi desupris, malfermis la pordon, kaj diris: «Kie vi estas?». Tonio sin montris, kaj samtempe sin prezentis ankaŭ Agnese, kiu salutis Perpetua-n nomvoke.

«Bonan vesperon, Agnese», diris Perpetua: «de kie oni revenas, ĉi-hore?».

«Mi revenas de...» kaj ŝi menciis najbaran vilaĝeton. «Kaj se vi scius...» ŝi daŭrigis: «mi malfruis ĝuste pro vi».

«Ho kial?» demandis Perpetua; kaj, sin turnante al la du fratoj: «Vi eniru», ŝi diris, «kaj tuj venos ankaŭ mi».

«Ĉar» respondis Agnese, «virino, el tiuj kiuj ne konas la aferojn, kaj tamen emas klaĉi... ĉu vi kredus? obstinis, ke vi ne edziniĝis kun Beppe Oldplanduma, nek kun Anselmo la Longulo, ĉar ili malakceptis vin. Mi asertis, ke vi mem rifuzis ilin ambaŭ...».

«Tutcerte. Ho la mensoga! la mensogema! Kiu estas tiu virino?».

«Tion ne demandu, ĉar mi ne ŝatas malpacon dissemi».

«Vi ĝin diros, vi devas ĝin diri: ho la mensogema!».

«Sufiĉe... Sed vi ne povas kredi, kiom mi bedaŭris, ke mi ne konas detale la tutan historion, por konfuzi tian virinon».

«Vidu, ĉu eblas inventi tiaĵojn!» elkriis denove Perpetua; kaj tuj ŝi reparolis: «Pri Beppe, ĉiuj scias kaj povis konstati... He Tonio! fermetu la pordon, kaj ja supreniru, kaj tuj mi venos». Tonio jesis deinterne, kaj Perpetua daŭrigis sian ekscito-plenan rakonton.

Fronte al la enirpordo de Don Abbondio, malfermiĝis eta strato inter du dometoj, post kiuj ĝi kurbiĝis direkte al kampo.

Agnese ekiris tien, kvazaŭ ŝi volus iomete apartiĝi, por paroli pli libere; kaj Perpetua sekvis. Post kiam ili turniĝis kaj atingis lokon, de kie ne plu videblis tio, kio povas okazi antaŭ la domo de Don Abbondio, Agnese ektusis brue. Tio estis la signalo: Renzo aŭdis ĝin, kuraĝigis Lucia-n per brak-premo, kaj ambaŭ plu-iris piedpinte, tuŝe al la muro, plejsilente; ili atingis la pordon, puŝis ĝin plej singarde; mute kaj klinite ili eniris la koridoreton, kie la du fratoj ilin atendis. Renzo refermetis la pordon tute senbrue; kaj la kvaropo supreniris malpli brue ol unuopo. Atinginte la ŝtupar-placeton, la du fratoj proksimiĝis al la pordo de l' ĉambro situanta flanke de la ŝtuparo; la promes-geedzoj alpremiĝis al la muro.

«*Deo gratias*», diris Tonio klar-voĉe.

«Tonio, ĉu? Eniru», respondis la voĉo deinterne.

La vokito malfermis la pordon, apenaŭ sufiĉe por pasi li kaj la frato unuope. La lumo-strio, kiu subite eliris tra tiu aperturo, kaj desegniĝis sur la malhela planko de la ŝtupar-placeto, ekscitis Lucia-n, kvazaŭ ŝi estus malkovrita. Post kiam la du fratoj eniris, Tonio tirfermis post si la pordon: la promes-geedzoj restis en la mallumo senmove, orel-streĉe, retenante la spiron: plej forta sono estis la martelado de l' povra koro de Lucia.

Don Abbondio sidis, kiel ni diris, sur malnova seĝo, volvite en malnova mantelo, kun surkape malnova verto-ĉapo, kiu kadrumis lian vizaĝon, je la lumeto de malgranda lampo. Du densaj hartufetoj, elstaraj el sub la verto-ĉapo, du densaj brovoj, du densaj lipharoj, unu densa pintbarbo, ĉiuj grizblankaj kaj disaj sur tiu vizaĝo bruna kaj falta, aspektis kvazaŭ neĝ-kovritaj vepro, elstaraj el krutaĵo, sub luna helo.

«Ha! ha!» estis lia saluto, dum li deprenis la okulvitrojn,

kaj demetis ilin en la libreton.

«Sinjoro pastro ja diros, ke mi venis malfrue», diris Tonio, farante riverencon, kiun imitis, sed pli plumpe, Gervaso.

«Ja certe malfrue, ĉiusence. Ĉu vi scias ke mi malsanas?». «Ho! mi bedaŭras».

«Verŝajne vi tion aŭdis; mi malsanas, kaj mi ne scias, kiam mi povos min prezenti publike... Sed kial vi alkondukis tiun... tiun knabon?». «Nur por akompano, sinjoro pastro».

«Sufiĉe. Ni vidu».

«Estas dudek kvin novaj moneroj, el tiuj kun la bildo de sankta Ambrozo ĉeval-rajda», diris Tonio elpoŝigante envolvaĵon.

«Ni vidu», ripetis Don Abbondio; kaj, preninte la envolvaĵon, li surmetis denove la okulvitrojn, li malpakis, eligis la monerojn, ilin elnombris, turnis kaj returnis, kaj trovis ilin sendifektaj.

«Nun, sinjoro pastro, vi al mi redonos la kolĉenon de mia edzino Tecla».

«Prave», respondis Don Abbondio; poste li iris al ŝranko, elpoŝigis ŝlosilon, kaj ĉirkaŭrigardante, kvazaŭ por fortenti spektantojn, li malfermetis ties pordeton, kovris la tutan aperturon per sia persono, enmetis la kapon, por rigardi, kaj unu brakon, por preni la kolĉenon; li ĝin prenis, kaj, ferminte la ŝrankon, ĝin liveris al Tonio, dirante: «Ĉu bonorde?».

«Nun», diris Tonio, «bonvolu skribi nigron² sur blanko».

«Eĉ tion!» diris Don Abbondio: «Ĉian artifikon oni konas. He! Kiel suspektema fariĝis la mondo! Ĉu vi ne fidas je mi?».

² *nigron*...: t.e. kvitancon, ateste ke la ŝuldo estas pagita.

«Kiel, sinjoro pastro! ĉu mi fidas? Vi ofendas min. Sed, ĉar mia nomo estas en via libraĉo, en la flanko de ŝuldo... do, ĉar vi jam ĝenis vin, por skribi unufoje, tiel... el vivo al morto...».

«Bone, bone», interrompis Don Abbondio, kaj grumblante li malfermis tirkeston de la tablo, li eligis paperon, plumon kaj inkujon, kaj komencis skribi, eldirante la vortojn unu post alia, laŭgrade ke ili eliris de la plumo. Intertempe Tonio, kaj laŭ lia ordongesto ankaŭ Gervaso, starigis sin antaŭ la tablo, tiel ke ili kaŝis la pordon al la skribanto; kaj, kvazaŭ pro enuo, ili frotadis la plankon per la piedoj, por avizi la eksteran duopon, ke ili eniru, kaj samtempe konfuzi iliajn paŝo-bruojn. Don Abbondio, absorbite ĉe skribado, nenion alian atentis. Ĉe la frotado de tiuj kvar piedoj, Renzo kaptis la brakon de Lucia, ĝin premis por kuraĝigo, kaj ekiris, trenante ŝin, tute tremantan, ĉar per si mem ŝi ne kapablas veni. Ili eniris tute senbrue, piedpinte, detenante eĉ la spiron; kaj ili sin kaŝis malantaŭ la du fratoj. Dume Don Abbondio, finskribinte la kvitancon, ĝin relegis atentege, ne levante la okulojn el la papero; li ĝin faldis kvaroble, dirante: «Ĉu vi kontentas nun?» kaj per unu mano depreninte de surnaze la okulvitrojn, per la alia li prezentis la paperon al Tonio, levante la vizaĝon. Tonio, etendante la manon, por preni la paperon, ŝovis sin unuflanken, kaj Gervaso, laŭ lia ordongesto, aliflanken; kaj meze, kvazaŭ ĉe malfermo de sceneja kurteno, aperis Renzo kaj Lucia. Don Abbondio unue ekvidis konfuzo, poste ekvidis klare, ektimis, ekmiris, koleris, ekpensis, decidis: ĉio dum la tempo, kiun Renzo okupis, por eldiri la vortojn: «Sinjoro parokestro, je ĉeesto de ĉi tiuj atestantoj, ĉi tiu estas mia edzino». Liaj lipoj ankoraŭ ne tute haltis, kiam Don Abbondio,

faliginte la paperon, per la maldekstra kaptis kaj levis la lampon, per la dekstra kaptegis la tablo-tapiŝon, rapidege ĝin tiris al si, planken ĵetante libron, paperon, inkujon kaj sorbo-sablujon³; kaj, eksaltinte inter la seĝo kaj la tablo, proksimiĝis al Lucia. La povrulino, per sia voĉo dolĉa, kaj tiam tute timtrema, apenaŭ sukcesis eldiri: «Kaj ĉi tiu...», kiam don Abbondio krudmaniere al ŝi ĵetis la tapiŝon surkapen kaj survizaĝen, por malebligi la eldiron de la tuta formulo. Kaj tuj faliginte la lampon, kiun li tenis en la alia mano, ankaŭ per ĉi-lasto li kunlaboris volvi ŝin en la tapiŝo, tiel ke li preskaŭ ŝin sufokis; kaj dume li kriegis per la tuta enhavo de sia spir-tubo: «Perpetua! Perpetua! perfido! helpon!». La lampo-meĉo, estingiĝante surplanke, eligis etan, intermitan lumon sur Lucia-n, kiu, konfuzegite, eĉ ne provis malvolvi la tapiŝon, kaj aspektis kvazaŭ modlata argila statuo, sur kiun la artisto ĵetis malsekan tukon. Kiam ĉia lumo ĉesis, Don Abbondio lasis la povrulinon, kaj palpserĉis la pordon kondukan al pli interna ĉambro; li trovis ĝin, eniris tien, enfermis sin, plu kriante: «Perpetua! Perpetua! perfido! helpon! For de ĉi tiu hejmo! For de ĉi tiu hejmo!». En la alia ĉambro regis tuta konfuzego: Renzo, strebis haltigi la pastron, kaj remis per la brakoj, kvazaŭ li farus blind-ludon, ĝis li atingis la pordon kaj li frapadis kriante: «Malfermu, malfermu; ne faru bruaĉon». Lucia vokadis Renzon, mallaŭte, kaj diris petege: «Ni foriru, ni foriru pro amo al Dio». Tonio, kvarpiede surtere, balaumis per la manoj la plankon, provante rekapti sian kvitancon. Gervaso, obsedate, kriis kaj saltetis, serĉante la ŝtupar-pordon, por elsaviĝi.

³*sorbo-sablujon*: vazeto kun fajna sorbo-sablo, tiam uzata por sekigi inkon.

Ĉe tia baraktado, ni nepre devas halti momente, por fari konsideron. Renzo, kiu nokte kriaĉis en alies hejmo, kien li enŝteliĝis, kaj sieĝis en ĉambro la mastron mem, tute aspektis kiel subpremanto; sed fakte estis li mem la subpremato. Don Abbondio, surprizite, fuĝigite kaj terurite, dum li trankvile prizorgis siajn aferojn, ŝajnis la viktimo; sed fakte estis li mem la perfortanto. Tiele ofte iras la mondo... pardonu, tiele ĝi iris en la deksepa jarcento.

La sieĝato, vidante ke la malamiko ne montras intencon retreti, malfermis fenestron turnitan al la preĝeja placo, kaj komencis kriadi: «helpon! helpon!». Regis plej bela lun-helo; la ombro de la preĝejo, kaj iom distance la longa, pinta ombro de la sonoril-turo, etendiĝis malhela kaj distinga sur la herboza kaj brila grundo de la placo: ĉiu objekto distingiĝis preskaŭ kiel dumtage. Sed ĝis rigard-atingo ne vidiĝis indico de vivanta homo. Tamen, tuŝe al la flanka muro de la preĝejo, kaj ĝuste fronte al la pastrejo, staris aĉa loĝejeto, kie dormis la sakristiano. Lin ekvekis tiu kruda kriaĉo; li eksaltis, rapidege ellitiĝis, malfermis la ŝutron de fenestreto, eligis la kapon, kun duonfermitaj palpebroj, kaj diris: «kio estas?».

«Alkuru, Ambrogio! helpon! homoj en mia hejmo», al li kriis Don Abbondio. «Tuj mi venas», li respondis; li retiris la kapon, refermis la ŝutron, kaj, kvankam duondorma kaj pli ol duonkonsternita, li tuj eltrovis rimedon, por doni pli da helpo ol petate, ne enmiksante sin mem en ajnan batiĝon. Li kaptas la pantalonon, kiun li tenis surlite; ĝin enŝovas sub-braken, kvazaŭ paradan ĉapelon, kaj desupras salt-kure tra ligna ŝtupareto; li rapidas al la sonoril-turo, li kaptas la ŝnuron de l' pli dika el la du sonoriletoj tie pendantaj, kaj li sonorigas alarme.

Ton-ton-ton-ton: la kampuloj abrupte eksidas surlite; junuloj kuŝantaj en fojnejoj streĉas orelojn kaj leviĝas. «Kio estas? Kio estas? Sonoras alarme! ĉu fajro? ŝtelistoj? banditoj?». Multe da virinoj konsilas, petegas la edzojn ne moviĝi, lasi ke alkuru aliaj; kelkaj leviĝas, kaj iras al fenestro; la poltronoj⁴, kvazaŭ cedante al la virinaj petegoj, sin kuŝigas denove; la plej scivolaj kaj plej bravaj desupras kapti forkegojn kaj pafilojn, por alkuri al la bruo; aliaj spektadas.

Sed antaŭ ol tiuj pretiĝis, eĉ antaŭ ol ili tute vekiĝis, la bruo jam atingis la orelojn de aliaj neforaj homoj, kiuj maldormis, stare kaj vestite: la bravuloj unuloke, Agnese kaj Perpetua aliloke. Antaŭe ni diros mallonge, kion faris la unuaj, ek de la momento, kiam ilin ni lasis, parte en la domaĉo kaj parte en la drinkejo. Ĉi-lasta triopo, vidinte ĉiujn pordojn fermitaj kaj la straton senhoma, eliris rapide, kvazaŭ konsciinte ke estas malfrue, kaj dirante ke ili intencas tuj hejmen iri; ili rondiris tra la vilaĝo, por konstati, ĉu ĉiuj retiriĝis; kaj fakte ili renkontis eĉ ne unu vivantan homon, nek aŭdis eĉ plej etan brueton. Ili pasis tut-silente antaŭ nia povra dometo: la plej kvieta el ĉiuj, ĉar neniu plu estis en ĝi. Tiam ili iris rekte al la domaĉo, kaj faris raporton al sinjoro Grizulo. Li tuj al si metis surkapen ĉapelaĉon, surŝultren pilgrim-mantelon el vaksita tolo, kun dise alkroĉitaj konkvoj; li prenis pilgrim-bastonon, kaj li diris: «ni iru brave: silentu kaj atentu ordonojn»; li ekiris unua, kaj la aliaj sekve; kaj baldaŭ ili atingis la dometon tra vojo kontraŭa al tiu, tra kiu ĵus foriris nia grupeto, direkte al siavica ekspedicio. La Grizulo retenis la trupon kelkpaŝe distance, kaj pluiris sola, por esplori, kaj, vidinte ĉion dezerta kaj trankvila ekstere, li venigis du el tiuj

⁴ poltronoj: pigraj, malbravaj homoj.

fiuloj, al ili ordonis surgrimpi tute senbrue la muron, kiu baris la korteton, kaj, desuprinte internen, sin kaŝi en angulo, malantaŭ densa figarbo, kiun li estis rimarkinta matene. Post tio, li frapetis mallaŭte la pordon, por ŝajnigi sin erarvoja pilgrimulo, kiu petas gastigon ĝismatene. Neniu respondas: li refrapas iom pli laŭte; ne eĉ plej eta brueto. Tiam li iras voki trian fiulon, lin desuprigas en la korteton, kiel la aliaj du, kun la ordono malnajli, tute senbrue, la riglilon, por havigi liberaj eniron kaj retreton. Ĉio efektiviĝas tut-singarde kaj prospere. Li iras voki la ceterajn, ilin enirigas kaj sendas ilin kaŝiĝi apud la unuaj; li fermetas plej silente la ĉe-stratan pordon, starigas interne du sentinelojn;⁵ kaj li iras rekte al la pordo de la ter-etaĝo. Ankaŭ tie li frapetas, kaj atendas: li ja atendu! Plej senbrue li malnajlas ankaŭ tiun pordon: de-interne neniu diras: kiu tie?; neniu aŭdigas sin: pli glate la afero ne povus iri. Antaŭen do: «ts!», li vokas tiujn sub la figarbo, eniras kun ili la ter-etaĝan ĉambron, kie tiumatene li almozaĉis tiun pan-pecon. Li eligas tindron⁶, fajro-ŝtonon, fajrilon kaj sulfuraĵojn, ekflamigas sian lanterneton, eniras en duan, pli internan ĉambron, por certiĝi ke ĉeestas neniu: fakte neniu ĉeestas. Li revenas, iras al la ŝtupar-pordo, rigardas, streĉas la orelon: soleco kaj silento. Li lasas du aliajn sentinelojn ter-etaĝe, venigas post li la Nerideman, bravulon el la kamparo de Bergamo, kiu sola rajtos minaci, silentigi, ordoni, entute esti ununura parolanto, por ke la bergama dialekto kredigu al Agnese, ke la ekspedicio venas de tie. Kun li ĉeflanke kaj la aliaj malantaŭe, la Grizulo alsupras plej senbrue, en sia koro blasfemante ĉe ĉiu ŝtupo, kiu eventuale kraketas, ĉe ĉiu paŝo,

⁵ *sentinelojn*: gardo-starantojn.

⁶ *tindron*: ekbruleman materiaĵon.

kiu bruetas. Fine, jen li estas supre. Ĉi tie kuŝas leporo!⁷ Milde li puŝas la pordon aliran al la unua ĉambro; cedas la pordo, malfermiĝas fendeto: tien li turnas okulon; estas mallume: tien li turnas orelon, por aŭdi, ĉu interne iu ronkas, spiras, baraktetas; nenio. Antaŭen do: li metas la lanternon antaŭ sia vizaĝo, por vidi ne vidate, li malfermegas la pordon, li vidas liton, sin ĵetas sur ĝin: la lito estas ordigita kaj gladumita, kun la littuko refaldita kaj ĝustigita sur la kapkuseno. Li kuntiras la ŝultrojn, sin turnas al la kunularo kaj gestas, ke li eniras la alian ĉambron, kien ili sekvu tute senbrue; li eniras, faras la samajn ceremoniojn, trovas la saman aferon. «Kia diablo estas?» li tiam diras: «ĉu ia perfida hundaĉo spionis?». Ĉiuj malpli singarde komencas rigardi kaj palpi ĉiuloke, kaj prirenversas la tutan domon. Dum ili estas okupitaj ĉe tio, la du sentineloj ĉe la strat-flanka pordo aŭdas bruon de paŝetoj rapide proksimiĝantaj; ili imagas, ke temas pri ia homo, kiu senhalte preteriros; ili staras senmovaj kaj por ĉia eventualo alarmopretaj. Fakte la paŝ-bruo ekhaltas ĝuste ĉe la pordo. Estis Menico, alkuranta sendite de patro Cristoforo averti la du virinojn tuj forkuri – pro amo al la Ĉielo! – el la hejmo, kaj rifuĝi al la monakejo, ĉar... la kialon vi scias. Li kaptas la anson⁸ de la riglilo, por frapeti, kaj li sensas ĝin oscili enmane, malfiksita kaj malnajlita. – Kio estas tio? – li pensas; kaj timoplene li puŝas la pordon: ĝi malfermiĝas. Menico enpaŝas, kun granda suspekto, kaj tuj li sentas sin kaptita je l' brakoj, kaj du mallaŭtajn voĉojn, dekstre kaj male, minace dirantaj: «ŜŜ! aŭ vi mortas». Sed li eligas kriegon: unu el la fiuloj al li metas manon surbuŝen; la alia eligas tranĉilaĉon, por lin teruri. La

⁷ *leporo*: serĉata viktimo.

⁸ *anson*: kurban aŭ ringo-forman tenilon.

knabeto tremas kiel arbo-folio, kaj eĉ ne provas krii; sed subite, anstataŭ li, kaj kun tute alia tono, aŭdiĝas tiu tia unua sonoril-bato, kaj poste tuta hajlado de battoj sinsekvaj. Kiu difektas tiu suspektas, diras Milana proverbo: al ambaŭ kanajloj ŝajnis en tiuj sonoroj aŭdi sian antaŭ-nomon, familinomon kaj al-nomon; ili lasas la brakojn de Menico, rapide retiras la siajn, malfermegas manojn kaj buŝojn, rigardas sin reciproke vizaĝen, kaj ekkuras al la domo, kie estas la ĉeftaĉmento. Menico ekkuregas surstraten, direkte al la sonoril-turo, kie iu nepre ĉeestas. Al la aliaj fiuloj, esplorantaj la domon desupre ĝisfunde, la terura sonoro faris la saman impreson: ili konfuziĝas, malordiĝas, sin puŝas reciproke: ĉiu serĉas plej kurtan vojon al la elir-pordo. Kaj tamen temis pri homoj harditaj kaj kutimaj malkaŝi la vizaĝon: sed ili ne povis resti firmaj kontraŭ danĝero ne difinita nek aperinta malproksime, antaŭ ol fali sur ilin. Necesis la tuta supereco de l' Grizulo, por ilin kunteni, tiel ke tio ĉi estu retro kaj ne forkuro. Kiel hundo gardanta porkaron diskuras al la brutoj kiuj disiĝas de la grego, mordetas unu-n je l' orelo, kaj tiras ĝin en la gregon; kaj ĝi puŝas alian per la muzelo; kaj ĝi bojas kontraŭ tria, kiu elviciĝas tiumomente; tiele la pilgrimulo kaptegas el ili unu-n, kiu jam atingis la sojlon, kaj krude lin retiras; per la pilgrim-bastono li repuŝas unuan kaj duan, kiuj tien sin direktis; li kriaĉas kontraŭ la aliaj, kiuj diskuras zigzage, ne sciante kien; ĝis li ĉiujn kolektaĉis mezen de la korteto. «Rapidu, rapidu! pistolojn enmane, tranĉilojn pretaj, ĉiuj kune; kaj poste ni ekiros: tiele oni iru. Kiu do nin tuŝu, se ni restas tute kunaj, ho stultaĉaj? Sed se ni lasos kapti nin po unu, eĉ kampulaĉoj nin batos. Honton! Post min, ĉiuj kune!». Post ĉi mallonga oratoraĵo, li starigis sin ĉe-fronte, kaj eliris

unua. La dometo, kiel ni diris, situis funde de la vilaĝo; la Grizulo ekiris la vojon eksteren de ĝi, kaj ĉiuj lin sekvis bonorde.

Ilin ni lasu foriri, sed ni retropaŝu, por rekapti Agnese-n kaj Perpetua-n, kiujn ni forlasis en iu strateto. Agnese estis klopodinta distancigi kiel eble plej multe la alian virinon for de la hejmo de Don Abbondio; kaj la afero iu-grade sukcesis. Sed subite la servistino memoris, ke la pordo restas malfermita, kaj decidis reiri. Ne eblis kontraŭdiri: Agnese, por tute ne suspektigi ŝin, devis kun ŝi returniĝi, ŝin sekvi, sed strebante reteni ŝin, ĉiufoje kiam ŝi vidis ŝin fervorega ĉe l' rakonto pri tiuj du fiaskintaj geedziĝoj. Ŝi ŝajnis aŭskultegi, kaj de tempo al tempo, por montri sin atenta, aŭ por relanĉi la babilon, ŝi diris: «ja certe: nun mi komprenas; bonege: estas klare; kio poste? kion li? kion vi?». Sed dume ŝi faris kun si alian parolon: – Ĉu ili jam eliris? aŭ ĉu ili ankoraŭ estas ene? Ja stultis nia tuta triopo, ĉar ni ne akordiĝis pri signalo, por al mi sciigi, kiam do la afero sukcesis! Estis granda fuŝaĵo! Sed nun jam estas farite: nenio restas por fari, krom gardi ŝin kiel eble plej longe: en plej aĉa kazo, estos nur tempo-perdo. – Tiele, per kuretoj kaj haltetoj, ili revenis iom proksimen je la pastrejo, kiun tamen ili ankoraŭ ne vidis, kaŭze de tiu stratangulo: kaj Perpetua, ĉe grava punkto de sia rakonto, estis haltigita senreziste, eĉ senrimarke; kiam subite aŭdiĝis reeĥi desupre, en la senmova aera malpleno, tra l' vasta silento de l' nokto, tiu unua kriegaĉo de Don Abbondio: «helpu! helpu!».

«Kompaton! kio estis?» ekkriis Perpetua, kaj ŝi volus ekkuri.

«Kio estas? kio estas?» diris Agnese, retenante ŝin per la jupo.

«Kompaton! ĉu vi ne aŭdis?» ŝi replikis, malimplikante sin.

«Kio estas? kio estas?» rediris Agnese, ŝin kaptante je unu brako.

«Diableta virino!» elkriis Perpetua, ŝin repuŝante, por sin liberigi; kaj ŝi ekkuris. Kaj jen aŭdiĝas, pli fora, pli akuta, pli momenteta, la kriego de Menico.

«Kompaton!» krias ankaŭ Agnese; kaj ŝi ekgalopas malantaŭ la alian virinon. Ili apenaŭ eklevis la kalkanojn, kiam eksonis la sonorilo: unu bato, du, tri, kaj tiel plu: ili spronus la virinojn, se ili tion bezonus. Perpetua alvenas momenton antaŭ la alia; dum ŝi volas ekpuŝi la pordon, ĉilasta malfermiĝas de-interne, kaj ĉe-sojle aperas Tonio, Gervaso, Renzo, Lucia, kiuj, trovinte la ŝtuparon, estis desuprintaj salt-kure; kaj, ĉe aŭdo de tiu terura sonorado, rapidegis eskapi.

«Kio estas? kio estas?» anhele demandis Perpetua la du fratojn, kiuj respondis per puŝego, kaj devie malaperis. «Kaj kion vi! kiel! kion vi faras tie ĉi?» ŝi demandis poste la alian paron, tuj kiam ŝi rekonis ĝin. Sed ankaŭ ili eliris senresponde. Perpetua nenion alian demandis, por help-kuri tien, kie la bezono estis plej granda; rapide ŝi eniris la koridoron, kaj ekkuris laŭeble tra l' mallumo, direkte al la ŝtuparo.

La du geedzoj, restinte nur promesaj, trafis fronten al Agnese, anhelege alvenanta. «Ha! vi estas ĉi tie!» ŝi diris, eligante la vortojn kun peno: «Kiel sukcesis la afero? kio estas la sonorado? al mi ŝajnas ke mi aŭdis...».

«Hejmen, hejmen, antaŭ ol venos homoj», diris Renzo. Kaj tien ili ekiris; sed alkuras Menico, li ilin rekonas kaj haltigas kaj, ankoraŭ tute trema, diras duon-voĉe: «kien vi

iras? reen, reen, tra ĉi tie, al la monakejo!».

«Ĉu estis vi, kiu...?» ekis Agnese.

«Kio alia estas?» demandis Renzo. Lucia, tute konfuza, silentis kaj tremis.

«Ĉeestas diablo en la hejmo», reparolis Menico, anhele. Mi mem vidis ilin: ili volus min murdi: tion diris patro Cristoforo: kaj ankaŭ vi, Renzo, li diris ke vi devas tuj veni: krome mi mem vidis ilin; bonŝance, ke mi trovas vin ĉiujn ĉi tie! ĉion mi diros al vi pli poste, kiam ni estos for».

Renzo, kiu estis el ĉiuj malplej konfuzita, pensis ke konvenas tuj foriri ien ajn, antaŭ ol alkurus homoj; kaj ke plej sekure estas fari tion kion Menico konsilas kaj eĉ ordonas, kun la energio de terurita homo. Poste, survoje kaj for de la danĝero, eblos demandi de li plian klarigon. «Marŝu fronte», diris Renzo al li; kaj al la virinoj: «Ni iru kun li». Ili sin turnis, kaj ekiris rapide direkte al la preĝejo, transiris ties placon, kie dank' al Dio nenia vivanta homo ankoraŭ estis; ili eniris en strateton inter la preĝejo kaj la domo de Don Abbondio; ĉe la unua truo, kiun ili trovis en heĝo, enen, kaj for tra la kampoj.

Kiam ili foriris eble malpli ol kvindek paŝoj, jen homoj komencis amasiĝi sur la placo, kaj plimultiĝi de momento al momento. Ili rigardis sin reciproke je l' vizaĝo: ĉiu havis demandon por fari, neniun disponis respondon. La unuaj venintoj rapidis al la preĝeja pordo: ĝi estis tute fermita. Ili alkuris al la ekstera sonoril-turo; kaj unu el ili, metinte la buŝon je fenestreto, speco de murfendo, enigis demandon: «kia diablo estas?». Ambrogio, aŭdinte konatan voĉon, lasis la ŝnuron de l' sonorilo; kaj sekurigite, el la zumado, ke multe da homoj amasiĝis, respondis: «mi venas malfermi». Li rapide surmetis tiun aĵon, kiun li estis portinta sub-brake, de-interne

venis al la preĝeja pordo, kaj ĝin malfermis.

«Kio estas tiu tuta bruaĉo? – Kio estas? – Kie? – Kiu?». «Kiel, kiu estas?» diris Ambrogio, per unu mano tenante pordo-klapon kaj per la alia la randon de tiu aĵo, kiun li tiel urĝe estis surmetinta: «kiel? ĉu vi ne scias? homoj en la hejmo de l' sinjoro pastro! Kuraĝe, knaboj: helpu!». Ĉiuj sin turnas al tiu domo, proksimiĝas amase, supren-rigardas, streĉas orelojn: ĉio kvietas. Aliaj kuras al la flanko, kie estas la enir-pordo: ĝi estas fermita kaj aspektas ne-tuŝita. Ankaŭ ili mem rigardas supren: nenia malfermita fenestro; eĉ ne plej eta brueto.

«Kiu enestas? – He, he! – Sinjoro pastro! – Sinjoro pastro!». Don Abbondio, kiu, konstatinte l' eskapon de l' invadintoj, retiriĝis de la fenestro, refermis ĝin, kaj tiumomente mallaŭte kvereletis kun Perpetua, ke ŝi lasis lin sola en tiu impliko, aŭdante sin vokata popol-voĉe, devis reiri al la fenestro; kiam li vidis tiun grandan helpon, li pentis, ke li ĝin petis.

«Kio estis? – Kion oni al vi faris? – Kiuj ili estas? – Kie ili estas?» al li kriis kvindek voĉoj kune.

«Neniu plu ĉeestas: mi dankas vin; ja revenu hejmen».

«Sed kiu estis? - Kien ili iris? - Kio do okazis?».

«Maliculoj, noktaj vagabondoj; sed ili jam forkuris: revenu hejmen; nenio plu estas; alifoje, filetoj: dankon pro via bonkoreco». Tion dirinte, li retiriĝis, kaj fermis la fenestron. Ĉe tio unuj komencis grumbli, aliaj primoki, triaj sakri; aliaj kuntiris la ŝultrojn kaj foriris: kiam jen alvenas ulo tute anhela, tiel ke li penis kunmeti vortojn. Li loĝis preskaŭ fronte al niaj virinoj; kaj kiam, ĉe l' bruo, li estis alirinta al fenestro, li vidis en la korteto tiun konfuzegon de l' bravuloj, kiam la Grizulo klopodegis ilin kolekti. Reakirinte spir-kapablon, la homo

ekkriis: «kion vi faras ĉi tie, knaboj? la diablo ne estas tie ĉi; ĝi estas malsupre, fine de la strato, hejme de Agnese Mondella: armitaj homoj estas ene; ŝajnas ke ili volas murdi pilgrimulon. Nesciate, kia diablo ĉeestas!».

«Kio? - Kio? - Kio?». Kaj jen komenciĝas tumulta interkonsiliĝo: «Endas iri. - Endas vidi. - Kiom nombraj ili estas? - Kiom multe ni mem estas? - Kiuj estas? - La vilaĝestro! La vilaĝestro!».

«Jen mi», respondas la vilaĝestro elinter la homamaso: «jen mi; sed endas helpi min, endas obei. Rapide: kie estas la sakristiano? La sonorilon, la sonorilon! Rapide! unu viro kuru al Lecco, por helpo-peti: venu ĉi tien ĉiuj...».

Iu alkuras, alia zigzagas inter la aliaj kaj ŝtelfuĝas; la tumulto estis granda, kiam alvenas alia homo, kiu estis vidinta la bravulojn forkuri, kaj krias: «help-kuru, knaboj: ŝtelistoj aŭ banditoj, kiuj forfuĝas kun pilgrimulo: ili jam estas ekster la vilaĝo: batu! batu!». Ĉe tiu avizo, ne atendante ordonojn de l' kapitano, oni ekmarŝas amase, senorde suben tra l' vojo; laŭgrade ke la armeo antaŭeniras, avangardanoj malakcelas la paŝadon, lasas ke aliaj preterpasu, dum ili sin enŝovas mezen de la taĉmento; la lastaj antaŭen-puŝas; fine la konfuza svarmo atingas la indikitan lokon. La spuroj de la invado estis freŝaj kaj evidentaj: la pordego tute malfermita, la seruro malnajlita; sed la invadintoj jam malaperis. Oni eniras la korton; oni iras al la teretaĝa pordo: ankaŭ ĝi estas malfermita kaj malnajlita; oni vokas: «Agnese! Lucia! Pilgrimulo! Kie estas la pilgrimulo? Ja Stefano sonĝis pilgrimulon! - Ne, ne: lin vidis ankaŭ Carlandrea. He, pilgrimulo! - Agnese! Lucia!». Neniu respondas. «Oni forkaptis ilin! oni forkaptis ilin!». Tiam iuj laŭvoĉe proponis persekuti la forkaptintojn: ĉar estas fi-fame;

kaj estus hontinde por la vilaĝo, se ĉia fiulo rajtus senpune veni por forrabi virinojn, kiel milvo kokidojn el senhoma draŝejo. Nova kaj pli tumulta konsiliĝo; sed iu (neniam ĝuste sciiĝis, pri kiu temis) lanĉis en la grupon la onidiron, ke Agnese kaj Lucia elsaviĝis en iun domon. La onidiro diskuris rapide kaj krediĝis; oni ne plu parolis pri ĉasado al fuĝuloj: kaj la aro disiĝis, ĉiu al sia hejmo. Estis flustrado, bruado, frapado kaj malfermiĝo de pordoj, intermita apero de lanternoj, demandoj de virinoj el fenestroj, respondoj el la strato. Kiam ĉi-lastata fariĝis denove senhoma kaj silenta, la paroloj pludaŭris en la hejmoj, kaj estingiĝis je oscedoj, por rekomenci la postan matenon. Pluaj eventoj tamen ne okazis; escepte de jeno: ke tiun saman matenon, la vilaĝestro, dum li staris en sia kampo, kun la mentono en unu mano, kaj la kubuto apogita sur la tenilo de la platfosilo duon-enpikita en la grundon, kaj kun unu piedo sur la ŝpat-piedingo; dum li tiel staris, spekulativante⁹ en si mem super la misteroj de l' pasinta nokto, kaj super la kompleksa proporcio inter tio kio al li decas kaj tio kio al li oportunas fari, li vidis veni al li renkonte du virojn kun tre fortika kompleksio, longharajn kiel du reĝoj de l' Frankoj de l' unua dinastio, kaj cetere similegaj al la du uloj, kiuj antaŭ kvin tagoj alfrontis Don Abbondion, se ne temis ĝuste pri la samaj. Ĉi tiuj, en maniero eĉ malpli ceremonia, ordonegis al la vilaĝestro, ke li tute ne faru denuncon al la komunumestro pri la okazintaĵo; ke, eventuale demandite, li ne respondu la veron; ke li mem ne klaĉu, nek favoru klaĉojn de l' kampuloj, proporcie ke li ŝatas la esperon morti pro malsano.

Niaj fuĝantoj dum iom da tempo trotpaŝis silente,

⁹ *spekulativante*: cerbumante.

retrorigardante, jen unu jen alia, por vidi, ĉu oni persekutas ilin, tute anhelaj pro la peno de la forkuro, pro la ĵusaj korbato kaj suspenso, pro la ĉagreno de la malsukceso, pro la konfuza timsento pri l' nova obskura danĝero. Kaj eĉ pli anhelaj ilin tenis tiuj daŭraj sonorilbatoj, kiuj, foriĝante, ju pli mallaŭtaj kaj obtuzaj, des pli ŝajnis akiri ion tristan kaj sinistran. Fine ili ĉesis. Tiam la fuĝuloj, estante en senhoma kampo, kie oni aŭdis eĉ ne bloveton, malakcelis la paŝadon; kaj Agnese kiel unua, reakirinte spiradon, rompis la silenton, demandante Renzon, kiel rezultis la afero, demandante Menicon, kio do estis tiu diablo hejme. Renzo resume rakontis sian malfeliĉan historieton; kaj la triopo sin turnis al la infano, kiu pli detale raportis la averton de l' religiulo, kaj rakontis tion kion li mem vidis kaj riskis, kaj kio bedaŭrinde konfirmis la averton. La aŭskultantoj komprenis pli multe ol kiom Menico sukcesis diri: kaj ili sentis horror-tremon; la triopo ekhaltis samtempe, rigardis sin reciproke vizaĝen kun teruro, kaj tuj, per unuanima movo, ĉiuj metis la manon, aŭ sur la kapon, aŭ sur la ŝultrojn de la knabo, kvazaŭ por lin karesi, por senparole lin danki, ke li estis por ili gardanĝelo, por al li esprimi sian kompaton pro la suferita angoro kaj la riskita danĝero por ilia savo; kaj kvazaŭ por lin pardonpeti. «Nun vi reiru hejmen, por ke tie oni ne maltrankvilu pri vi», al li diris Agnese; kaj rememorante la du promesitajn monerojn, ŝi elpoŝigis kvar da ili, kaj donis ilin al li, aldonante: «Sufiĉe: preĝu la Di-Sinjoron por baldaŭa revido, kaj tiam...». Renzo al li donis grandan novan moneron, kaj multe al li rekomendis, tute nenion diri pri la komizio ricevita de la kapuceno; Lucia karesis lin denove, kaj lin salutis kun korpremita voĉo; la knabo ĉiujn salutis kortuŝite, kaj returnis sin. Ili pluiris sian vojon, tute enpensaj;

la virinoj antaŭe, kaj Renzo malantaŭe, kvazaŭ gardostare. Lucia prem-tenis la brakon de la patrino, kaj evitis milde kaj lerte la helpon, kiun la junulo al ŝi gestis en la malfacilaj paŝoj de tiu ekstervoja marŝado, ĉar eĉ en tia ekscito ŝi sentis en si honton, ke ŝi restis kun li sola tiel longe kaj tiel intime, kiam ŝi esperis tuj fariĝi lia edzino. Nun, ĉe tiel trista disvaporigo de tiu revo, ŝi pentis ke ŝi tro aŭdacis kun li, kaj, inter tiom da motivoj por tremi, ŝi tremis ankaŭ pro tia pudoro, kiu ne estiĝas el trista scio de l' malbono, pro tia pudoro, kiu ne scias sin mem, simile al la timo de l' infano, kiu tremas en mallumo, nesciante pro kio.

«Kaj kio pri la hejmo?» diris abrupte Agnese. Sed, kvankam la demando estis grava, neniu respondis, ĉar kontentigan respondon neniu povis doni. Ili daŭrigis sian vojon senparole, kaj, post nemulte, ili atingis la etan placon antaŭ la monakeja preĝejo.

Renzo aliris al la pordego kaj puŝetis ĝin diskrete. Fakte la pordo malfermiĝis; kaj la lun-radio, enirante tra l' fendeto, lumigis la palan vizaĝon kaj la arĝentan barbon de patro Cristoforo, kiu tie staris atende. Konstatinte, ke neniu mankas, «Dio estu benata!» li diris, kaj li gestis ke ili eniru. Apud li staris alia kapuceno: la laika sakristiano, kiun patro Cristoforo per petegoj kaj rezonoj persvadis maldormi kun li, lasi la pordon duonfermita kaj gardostari, por gastigi tiujn povrajn minacitojn; kaj necesis la tuta aŭtoritateco de la patro, kaj lia famo pri sankteco, por ke la laiko donu sian ĝenatan, danĝeran kaj kontraŭ-regulan konsenton. Apenaŭ ili eniris, patro Cristoforo fermetis tute senbrue la pordon. Tiam la sakristiano ne plu eltenis, kaj vokinte la patron aparten, komencis al li flustri ĉe-orele: «sed patro, patro! dumnokte... en preĝejo...

kun virinoj...¹⁰ fermi... la kapucena regulo... sed patro!». Kaj li balancis la kapon. Dum li pene eligis tiujn vortojn, - Vidu do, – pensis patro Cristoforo, – se temus pri persekutata rabisto, frato Fazio tute nenian kontraŭdiron elmetus; sed koncerne povran senkulpulinion, forkurantan de l' ungegoj de lupo... «*Omnia munda mundis*¹¹», li diris poste, subite turnante sin al frato Fazio, kaj forgesante ke ĉi-lasta ne komprenas latine. Sed ĝuste tiu forgeso efikis. Se la patro komencus diskuti per rezonoj, al frato Fazio ne mankus kontraŭ-rezonoj; kaj neniu scias, kiam kaj kiel la afero konkludiĝus. Sed ĉe aŭdo de tiuj vortoj plenaj de mistera senco, kaj eldiritaj tiel rezolute, al li ŝajnis ke tie nepre kuŝas la solvo de ĉiuj liaj duboj. Li kvietiĝis kaj diris: «sufiĉe! pri tio vi scias pli multe ol mi».

«Vi ja fidu», respondis patro Cristoforo; kaj, je l' malcerta lumeto de l' lampo, kiu flametis antaŭ la altaro, li proksimiĝis al la rifuĝintoj, kiuj estis en streĉa atendo, kaj diris al ili: «filetoj! danku la Di-Sinjoron, ke li vin forsavis el grava danĝero. Eble, en ĉi tiu momento...!». Kaj ĉe tio li komencis klarigi tion kion li aludetis per la eta mesaĝisto: ĉar li ne suspektis ke ili scias pli multe ol li mem, kaj li opiniis, ke Menico trovis ilin trankvilaj hejme, antaŭ ol alvenus la fifaruloj. Neniu lin sentrompigis, eĉ ne Lucia, kiu tamen sentis sekretan konscienc-riproĉon pro tia malŝajnigo, kun tia homo; sed estis nokto de trompoj kaj kaŝ-elturnoj.

«Post tio ĉi», li daŭrigis, «vi tute komprenas, ke ĉi-vilaĝo nuntempe ne plu sekuras por vi. Ĝi ja estas via propra vilaĝo; tie vi naskiĝis; vi al neniu faris malbonon; sed tiel volas Dio.

¹⁰ *virinoj*...: ekleziaj reguloj malpermesis al virinoj eniri virajn monakejojn, kaj inverse.

¹¹ *Omnia munda mundis*: latine = Ĉio puras ĉe la kore puraj.

Estas provo, filetoj: eltenu ĝin kun pacienco, kun fidemo, sen malamo, kaj certu, ke venos tempo, kiam vi kontentos pri tio, kio nun okazas. Mi zorgis trovi al vi rifuĝejon, por ĉi-unuaj momentoj. Espereble baldaŭ vi povos reveni sekuraj al via hejmo; ĉiuokaze Dio providencos por via bono; kaj mi certe klopodos ne vanigi la gracon, kiun li al mi faras, elektante min lia servisto por vi, liaj povraj, karaj afliktitoj. Vi», li daŭrigis, sin turnante al la du virinoj, «vi povos resti en ***. Tie vi estos sufiĉe for de ĉia danĝero, kaj samtempe ne tro foraj de via hejmo. Serĉu nian kapucenan monakejon, venigu la patron-gardanton, donu al li ĉi tiun leteron: li estos al vi kiel dua frato Cristoforo. Kaj ankaŭ vi, mia Renzo, ankaŭ vi devas momente eskapi el la kolero de tiu homo, kaj ankaŭ el la via. Portu ĉi tiun leteron al patro Bonaventura el Lodi, en nia kapucenejo ĉe la Orienta Pordego en Milano. Li estos al vi patro, li gvidos vin, li trovos por vi laborpostenon, ĝis vi povos reveni vivi ĉi tie tute trankvile. Iru, vi ĉiuj, al la lago-bordo, apud la elfluejo de Bione». Ĝi estas torento, kelkpaŝe distanca de Pescarenico. «Tie vi vidos haltantan barkon; vi diros: boato. Oni vin demandas: por kiu; respondu: sankta Francisko. La boato vin akceptos, vin transigos al la alia bordo, kie vi trovos kaleŝeton, kiu rekte vin veturigos ĝis ***.

Se iu demandus, kiamaniere frato Cristoforo tuj disponigis tiujn veturilojn tra akvo kaj tero, tiu montrus ke li ne konas, kiom potencis tiuepoke kapuceno taksata kiel sanktulo.

Restis nur la problemo zorgi pri gardado de la domoj. La kapuceno ricevis iliajn ŝlosilojn, sin devigante ilin liveri al la homoj al li indikitaj de Renzo kaj Agnese. Ĉi-lasto, elpoŝigante sian ŝlosilon, eligis grandan suspiron, pensante ke

tiumomente ŝia domo estas malfermita, vizitita de la diablo, kaj neniu scias, kio restos por gardi!

«Antaŭ ol vi ekiros», diris la patro, «ni ĉiuj preĝu kune la Di-Sinjoron, ke Li akompanu vin dum ĉi-vojaĝo kaj ĉiam; kaj ĉefe Li donu al vi forton, Li donu al vi amon por voli tion kion Li mem volis». Ĉe tiuj vortoj li surgenuiĝis meze de la preĝejo, kaj ĉiuj faris la samon. Post kiam ili preĝis kelkmomente senparole, la patro, kun mallaŭta sed klara voĉo, eldiris jenajn vortojn: «ni Vin preĝas ankaŭ por tiu kompatindulo, kiu nin kondukis al tiu ĉi elpaŝo. Ni ne meritis vian mizerikordon, se ni ne petegus ĝin elkore por li: tiom multe li bezonas ĝin! En nia afliktiĝo, nin konsolas tio, ke ni estas sur la vojo, en kiun Vi mem nin metis: al Vi ni povas oferi niajn malfeliĉojn; kaj tiuj fariĝas gajno. Sed li!... li estas via malamiko. La malfeliĉega! Kun Vi li rivalas! Kompatu lin, Sinjoro, tuŝu lian koron, igu lin via amiko, donacu al li ĉiajn bonojn, kiujn ni povas deziri al ni mem».

Poste, leviĝinte kvazaŭ haste, li diris: «ek, filetoj! Oni ne perdu tempon: Dio vin gardu, lia anĝelo vin akompanu: ekiru». Kaj dum ili ekiris kun la emocio, kiu ne trovas vortojn, kaj manifestiĝas sen ili, la patro aldonis, kun emocia voĉo: «La koro al mi diras, ke baldaŭ ni nin revidos».

Certe, la koro, se ĝin aŭskulti, ĉiam havas ion por diri pri l' estonto. Sed kion scias koro? Nur parton de tio, kio jam estas okazinta.

Sen atendi respondon, frato Cristoforo ekiris al la sakristio; la vojaĝontoj eliris de la preĝejo; kaj frato Fazio fermis la pordegon, dirante al ili adiaŭ, ankaŭ li mem kun emocia voĉo. Ili ekiris tutsilente direkte al la indikita bordo; ili vidis la boaton preta, kaj post eldiro kaj respondo de la

pasvorto, ili enboatiĝis. La boatisto, puŝ-premante unu remilon kontraŭ la bordo, disiĝis de ĝi; kaj, kaptinte la alian, kaj remante du-brake, malproksimiĝis, direkte al la kontraŭa plaĝo. Nenia venteto blovetis; la lago kuŝis glata kaj plata, kaj ĝi aspektus tute senmova, se mankus la trem-brilo kaj la leĝera ondado de la luno, kiu en ĝi speguliĝis el la mezo de l' ĉielo. Aŭdiĝis nur la obtuza kaj lanta batiĝo de l' ondo kontraŭ la gruzon de l' bordo, la pli fora lirlado de l' akvo disrompata inter l' abutmentoj¹² de l' ponto, kaj la ritma plonĝado de l' du remiloj, kiuj tranĉis la lazuran supraĵon de l' lago, abrupte eliris gutante, kaj plonĝis denove. La ondo, tranĉate de la boato, kaj rekuniĝante malantaŭ ĝi, formis krispan strion, kiu pli kaj pli foriĝis de la bordo. La pasaĝeroj, silentaj, kun returnita kapo, rigardis la montojn, kaj la vilaĝon heligatan de la luno, kaj variigitan ie kaj tie de grandaj ombroj. Distingiĝis la vilaĝoj, la domoj, la kabanoj; la palaco de Don Rodrigo, kun sia plata turo, elstara super la dometoj amasigitaj sur la deklivo de la promontoro, aspektis kvazaŭ kruelulo, kiu, stare en mallumo meze de aro da dormantoj, maldormas, maĥinacianta krimon. Lucia ĝin vidis kaj horor-tremis; ŝi direktis la rigardon laŭ la deklivo ĝis sia vilaĝeto; ŝi fiksrigardis ĝian ekstremon, malkovris sian dometon, malkovris la densan branĉaron de l' figarbo elstaran super la muro de la korto, malkovris la fenestron de sia ĉambro; kaj, tiel sidante sur la grundo de la boato, ŝi metis la brakon sur ties randon, metis la frunton sur la brakon, kvazaŭ por dormi, kaj ŝi ploris sekrete.

Adiaŭ, montoj elstaraj el akvoj, kaj levitaj ĉielen;

¹² *abutmentoj*: masonaĵoj konstruitaj ĉe ambaŭ ekstretoj de punta arko, por ĝin subteni.

malegalaj kulminoj, intimaj al la homo inter vi kreskinta, kaj stampitaj en lia menso, ne malpli ol vizaĝoj de plej karaj familianoj; torentoj, kies plaŭdon li distingas kiel la sonon de l' hejmaj voĉoj; kampulaj domoj, disaj kaj blankaj sur la deklivo, kiel gregoj da paŝto-ŝafoj; adiaŭ! Kiom malĝojas la paŝo de l' homo kreskinta inter vi, kiu de vi foriĝas! Eĉ en la fantazio de tiu mem, kiu libervole foriras, ĉar lin allogas la espero trafi aliloke prosperon, tiumomente senbeliĝas la revoj pri riĉeco; li eĉ miras ke li foriri decidis, kaj volonte li tuj returnus sin, se li ne pensus, ke ian tagon li revenos riĉo-hava. Ju pli li marŝas tra l' ebenaĵo, des pli lia okulo, naŭzita kaj laca, evitas tiun unuforman etendaĵon; l' aero al li ŝajnas peza kaj senviva; li eniĝas malgaja kaj senatenta en la tumultajn urbojn; la domoj tuŝaj al domoj, la stratoj kondukaj al stratoj, kvazaŭe lin senspirigas; kaj fronte al la konstruaĵoj admirataj de l' fremduloj, li pensas kun malkvieta sopiro pri l' kampeto de sia vilaĝo, pri la dometo, al kiu li jam delonge okulumis, kaj kiun li aĉetos, post kiam li revenos riĉo-hava al siaj montoj.

Sed la homo, kiu trans tiujn montojn neniam etendis eĉ momentan deziron, kiu tie kunmetis ĉiujn planojn pri l' estonto, kaj de malica perforto estas de tie forĵetita! Kiu, samtempe disigita de l' plej karaj kutimoj, kaj perturbita en plej karaj esperoj, forlasas tiujn montojn, serĉe al nekonatoj, kiujn neniam li deziris ekkoni, kaj ne povas imagi difinitan momenton por reveni! Adiaŭ naskiĝ-hejmo, kie, kaŝ-pense sidante, oni lernis distingi, inter la bruoj de l' komunaj paŝoj, la bruoj de paŝo atendata kun mistera tim-sento. Adiaŭ, hejmo ankoraŭ fremda, hejmo tiomfoje rapide sub-rigardita preterpase, kaj ne sen ruĝiĝo; en kiu la menso revis trankvilan,

porĉiaman edzinan loĝadon. Adiaŭ, preĝejo, kie l' animo tiomfoje re-sereniĝis, kantante la laŭdojn de l' Di-Sinjoro; kie rito¹³ estis promesita kaj preparita; kie la sekreta kor-sopiro devus esti solene benita, kaj la amo ordonita kaj nomiĝi sankta; adiaŭ! Kiu donis al vi tiom da feliĉo, Tiu estas ĉiuloke; kaj neniam Li perturbas la ĝojon de siaj filetoj, krom por al ili pretigi alian pli certan kaj pli grandan.

Tiaj, se ne ĝuste tiuj, estis la pensoj de Lucia; kaj ne tre malsamis la pensoj de la aliaj migrantoj, dum la boato proksimigis ilin al la dekstra bordo de Adda-rivero.

¹³ *rito*: en-preĝeja geedziĝo.

IX

La kolizieto de l' boato kontraŭ la bordon skuetero Lucia-n, kiu forviŝis sekrete la larmojn kaj levis la kapon, kvazaŭ ŝi vekigis. Renzo elboatiĝis kiel unua, kaj etendis la manon al Agnese, kiu ankaŭ eliris kaj etendis la sian al la filino; kaj la triopo malĝoje dankis la boatiston. «Pro kio?» respondis ĉi-lasto: «ni estas ĉi-tere por nin helpi reciproke», kaj preskaŭ abomene li retiris la manon, kvazaŭ oni proponus al li ŝtelon, kiam Renzo provis enŝovi en ĝin parton de l' moneretoj, kiujn li estis kunportinta tiuvespere, kun la intenco pridonaci malavare Don Abbondion, post kiam li farus sian kontraŭvolan servon. La kaleŝeto staris tie preta; la koĉero bonvenigis la tri atendatojn, enkaleŝigis ilin, faris instigo-krion al la jung-besto, unu skurĝo-baton, kaj for.

Nia aŭtoro ne priskribas tiun noktan vojaĝon, kaj pretersilentas la nomon de la loko, kien frato Cristoforo direktis la du virinojn; li eĉ deklaras malkaŝe, ke li ne volas diri ĝin. Oni el la evoluo de nia historio komprenos la kialon de tiaj prisilentoj. La aventuroj de Lucia dum tiea restado implikiĝis en tenebra intrigo de persono apartenanta al familio verŝajne tre potenca en la epoko, kiam nia aŭtoro verkis. Por klarigi la strangan konduton de tiu persono rilate Lucia-n, la aŭtoro devis resume rakonti pri ties antaŭa vivo; kaj el tio rezultas pri ŝia familio bildo tia, kian vidos la leganto, kiu volos plu-legi. Sed niaj diligentaj esploroj malkovris aliloke tion, kion la singardemo de la povrulo volis kaŝi. Milana historiisto¹, menciinta tiun saman personon, prisilentas verdire ties nomon kaj lokon; sed pri ĉi-lasto li diras ke temas pri

¹ Josephi Ripamontii, *Historiae Patriae*, Decadis V, Lib. VI, cap. III, pag. 358 et seq. (N.d.A.).

antikva kaj nobela vilaĝego, kiu nur laŭnome ankoraŭ ne estas urbo; aliloke li diras, ke tie fluas Lambro-rivero; aliloke ke tie oficas ĉefpastro. El la kombino de ĉi tiuj elementoj ni konkludas, ke sendube tiu loko estis Monza. En la vasta stoko de l' erudiciaj induktoj, oni povas trovi aliajn pli subtilajn, sed miaopinie ne pli certajn. Ni eĉ povus, laŭ firme bazitaj konjektoj, diri la nomon de la familio; sed, kvankam ĝi jam delonge estingiĝis, ŝajnas al ni preferinde ĝin lasi en la skribilo, por eviti la riskon maljusti eĉ al mortintoj, kaj por postlasi al erudiciuloj kelkan objekton por esplori.

Niaj vojaĝantoj atingis Monza-n nemulte post la sunleviĝo: la koĉero eniris drinkejon, kaj tie, kiel spertulo pri la loko kaj konato de l' mastro, li havigis al ili dormoĉambron, kaj akompanis ilin en ĝin. Ĉe la dankoj, Renzo provis ankaŭ akceptigi al li kelke da moneroj; sed tiu homo, samkiel la boatisto, celis alian pli foran, sed pli abundan rekompenc²: ankaŭ li mem retiris la manojn, kaj kvazaŭ forkure li iris prizorgi sian jungbeston.

Post vespero, kian ni priskribis, kaj nokto kian ĉiu povas imagi, pasigita inter tiaj pensoj, kun senĉesa suspekto pri ĉagrena renkontiĝo, ĉe l' blovo de pli ol aŭtuna venteto, kaj inter daŭraj skuegoj de l' malkomforta veturilo, kiuj krude revokis tiun el ili, kiu eventuale fermetis l' okulojn, al la tuta triopo ŝajnis ne-kredeble sidiĝi sur firma benko, en ajna ĉambro. Ili faris matenmanĝon, kian ebligis la tiama malabundo kaj la malmulto da monrimedoj proporcie kun eventualaj bezonoj de malcerta estonteco, kaj kun ilia negranda apetito. La triopo memorpensis la festenon, kiun ili antaŭ du tagoj esperis; kaj ĉiu eligis suspiregon. Renzo volus

² postmortan rekompencon pro l' surtera kristana bonfaro.

almenaŭ tiun tutan tagon resti tie, vidi la virinojn loĝigitaj, al ili fari la unuajn servojn; sed al la virinoj patro Cristoforo estis rekomendinta, tuj forsendi lin al lia celo. Ili do prezentis kaj tiujn ordonojn kaj cent aliajn rezonojn: ke oni klaĉus; ke disiĝo prokrastita estus pli ĉagrena; ke baldaŭ li povos veni, por rakonti kaj aŭdi novaĵojn; tiel ke li decidis foriri. Ili interkonsentis, laŭpove, pri la maniero revidiĝi kiel eble plej baldaŭ. Lucia ne kaŝis la larmojn; Renzo apenaŭ retenis la siajn, kaj premante tre energie la manon de Agnese, li diris kun sufokita voĉo: «Ĝis revido», kaj foriris.

Granda estus la embaraso de la virinoj, se ne ĉeestus tiu bonkora koĉero, kiu estis ricevinta la ordonon gvidi ilin al la kapucenejo, kaj fari al ili ĉian helpon eventuale bezonatan. Ili do kun li ekiris al tiu monakejo, kiu, kiel ĉiu scias, distancis ne multe da paŝoj de Monza. Kiam ili atingis la enirpordon, la gvidanto tiris la tintilon kaj vokigis la patron gardanton; ĉi-lasto tuj venis kaj ricevis la leteron ĉe-sojle.

«Ho! frato Cristoforo!» li diris, rekonante la skribmanieron. La voĉ-tono kaj la vizaĝ-movoj evidentigis, ke li eldiras la nomon de granda amiko. Konvenas konjekti, ke en tiu letero nia bona Cristoforo rekomendis la du virinojn kun granda fervoro, kaj raportis ilian kazon kun granda sento, ĉar la gardanto, legante, de tempo al tempo esprimis per gestoj surprizon kaj indignon; kaj levante el la papero la okulojn, li fiksis ilin al la virinoj kun speciala esprimo de kompatato kaj intereso. Finleginte, li restis momente enpenso; poste li diris: «nur la senjorino povas: se la senjorino volas al ĉi tio sindevigi...». Poste li apartigis Agnese-n en la placo antaŭ la kapucenejo kaj faris al ŝi kelke da demandoj, kiujn ŝi kontentigis; li revenis al Lucia kaj diris al ambaŭ: «miaj

virinoj, mi provos; kaj mi esperas trovi por vi rifuĝejon pli ol sekuran, pli ol honoran, ĝis Dio al vi providencos pli bone. Ĉu vi bonvolas veni kun mi?».

La virinoj respektoplene gestis jese; kaj la frato reparolis: «bone; mi tuj kondukas vin al la monakinejo de la senjorino. Vi tamen restu kelkpaŝe malantaŭ mi, ĉar homoj ŝatas klaĉi malice; kaj ne sciate, kiom da trafaj klaĉoj oni farus, se vidi la patron gardanton surstrate kun bela junulino... mi intencas diri: kun virinoj».

Tion dirinte, li antaŭiris. Lucia ruĝiĝis; la koĉero ekridetis, rigardante Agnese-n, kiu ne povis eviti la samon; kaj la tuta triopo ekiris post la frato, kaj sekvis lin dek paŝojn distance; tiam la virinoj, kiuj ne aŭdacis pridemandi la patron gardanton, demandis la koĉeron, kiu do estas la senjorino.

«La senjorino», li respondis «estas monakino; sed ne monakino kiel la ceteraj. Ŝi verdire estas nek abatino, nek priorino; ŝi eĉ estas, onidire, unu el la plej junaj; sed ŝi estas el la ripo de Adamo³; kaj ŝiaj praavoj estas granda gento, el Hispanio, kie vivas niaj regantoj; kaj pro tio oni ŝin nomas la senjorino, por esprimi, ke ŝi estas granda senjorino, kaj la tuta loĝantaro nomas ŝin tiele, ĉar onidire neniam en tiu monakinejo loĝis tiaranga virino; kaj ŝiaj gentanoj, for en Milano, tre imponas, kaj apartenas al la homoj, kiuj ĉiam pravas; kaj eĉ plimulte ĉi tie en Monza, ĉar ŝia patro estas unuaranga en la urbeto, malgraŭ tio ke li ne loĝas ĉi tie; konsekvence ankaŭ ŝi mem en la monakinejo povas dispozicii laŭplaĉe; kaj ankaŭ la eksteraj homoj multege ŝin respektas; kaj kiam ŝi surprenas sindevigon, ŝi tute sukcesas plenumi ĝin; tial, se tiu bona kapuceno sukcesas meti vin en ŝiajn manojn,

³ *el la ripo de Adamo*: popola dirmaniero = el antikva nobela gento.

kaj ŝi akceptas vin, mi povas vin certigi, ke vi estos sekuraj kiel sur altaro».

La patro gardanto, kiam li proksimiĝis al la urbeto pordego, ĉe kies flanko tiam staris antikva duon-ruinigita turo ĉe kaj parto de kastelo, same duon-detruita (eble dek el miaj legantoj memoras, ke ili vidis ĝin stara), ekhaltis kaj retrorigardis, por vidi, ĉu la ceteraj alvenas; poste li eniris kaj sin direktis al la monakinejo; kiam li ĝin atingis, li denove ekhaltis ĉe-sojle, atendente la malgrandan societon. Li petis la koĉeron reveni post ĉirkaŭ du horoj, por ricevi respondon; tiu ĝin promesis, kaj adiaŭis la virinojn, kiuj superŝutis lin per dankoj kaj per mesaĝoj por patro Cristoforo. La gardanto enirigis patrinon kaj filinon en la unuan korton de la monakinejo, enkondukis ilin en la ĉambrojn de la monakineja farmistino,⁴ kaj li sola iris peti la favoron. Post kelke da tempo li reaperis tute gaja, por diri ke ili aliru kun li; bonŝance, ĉar la filino kaj la patrino ne plu scipovis kiel elturniĝi el la insistaj scivolaj demandoj de la farmistino. Trairante duan korton, li donis kelke da instrukcioj al la virinoj, kiel konduki kun la senjorino. «Ŝi estas al vi favora», li diris, «kaj ŝi povas bonfari al vi laŭvole. Vi estu humilaj kaj respektemaj, respondu sincere la demandojn, kiujn ŝi bonvolos al vi fari, kaj, se ŝi ne faros demandojn, vi lasu la aferon al mi». Ili eniris ter-etaĝan ĉambron kondukan en la vizit-salonon: antaŭ ol enpaŝi, la gardanto, montrante la pordon, mallaŭte diris al la virinoj: «ŝi estas ĉi tie», kvazaŭ por resumi ĉiujn donitajn admonojn. Lucia, kiu neniam estis vidinta monakinejon, enirinte la vizitejon, ĉirkaŭ-rigardis, por vidi, kie do estas la senjorino,

⁴ *farmistino*: kultivistino de la monakaj kampoj, kaj, pli ĝenerale, monakineja helpantino.

por sin klini al ŝi, kaj tute neniun vidinte, ŝi restis kvazaŭ ensorĉite; kiam, vidinte la patron kaj Agnese-n iri al angulo, ŝi rigardis tiudirekten, kaj ekvidis strang-forman fenestron kun du dikaj, densaj ferkradoj, interdistancaj unu spanon;⁵ kaj malantaŭ la kradoj starantan monakinon. Ŝia aspekto, kiu konjektigis aĝon de ĉirkaŭ dudek kvin jaroj, unuavide donis impreson de beleco, sed beleco disbatita, forvelkinta, kaj mi aŭdacus diri taŭzita. Nigra vualo, horizontale streĉita sur la kapo, falis ambaŭflanke, iom distance de la vizaĝo; sub la vualo, blankega lina zono kovris ĝismeze la frunton, kies blankeco estis malsama, sed ne malpli intensa. Alia plisita tolzono kadris la vizaĝon, kaj finiĝis sub la mentono per gorĝumo, kiu etendiĝis iomete surbruste, kovrante la dekolton de l' nigra robo. Sed tiu frunto ofte faltiĝis, kvazaŭ pro dolora kuntiriĝo; kaj tiam la du nigraj brovoj rapid-move interproksimiĝis. Du okuloj, same tute nigraj, foje fiksrigardis la vizaĝon de l' homoj, kun fierega esploremo; foje ili rapide malleviĝis, kvazaŭ serĉante kaŝejon; atenta observanto povus foje konjekti, ke ili petegas amsenton, respondon, kompaton; alifoje li povus en ili diveni momentan rivelon de radikinta, premita malamo, ion minacan kaj ferocan; kiam la okuloj restis senmovaj kaj fiksjaj senatente, unuj imagus en ili orgojlan malvolontecon, aliaj suspektus turmenton de kaŝita penso, de zorgo kutima ĉe la animo, kaj ĝin absorbanta pli ol la ĉirkaŭaj objektoj. La vangoj, tute palaj, profiliĝis laŭ konturo delikata kaj gracia, sed misformita kaj mincigita pro lanta elĉerpiĝo. La lipoj, kvankam apenaŭ rozkoloraj, tamen kontrastis sur tiu paleco; iliaj movoj estis, kiel tiuj de l' okuloj,

⁵ *unu spanon*: proksimume kiel la distanco inter la dika kaj la eta fingro de disetendita mano.

subitaj, vivaj, plenaj de esprimivo kaj mistero. La proporcieco de ŝia figuro jen malaperis en iel neglekta sinteno, jen aperis misforme en iuj movoj subitaj, neregulaj, kaj tro rezolutaj ĉe virino, des pli ĉe monakino. Eĉ en la vesto-maniero estis ie kaj tie io afekta aŭ neglekta, kio konjektigis nekutiman monakinson: la robo ĉe l' talio estis strikta kun monduma zorgo, kaj el la kapa tol-zono eliris sur unu tempio tufeto da nigraj haroj; kio elmontris aŭ forgeson aŭ malŝaton de la monakina regulo, kiu preskribis la harojn ĉiam kurtaj, ek de kiam ili estis unuafoje tonditaj, en la solena ceremonio de survesto de l' monakina robo.

Ĉi tiuj aferoj ne ŝokis la du virinojn, ne spertajn distingi diversajn monakinojn; aliflanke la patro-gardanto, vidinte jam plurfoje la senjorinon, estis kutimiĝinta, kiel multaj aliaj homoj, al la strangaĵoj videblaj en ŝiaj aspekto kaj agmaniero.

Tiumomente ŝi staris, kiel ni diris, apud la krado, kun unu mano langvore apogita al ĝi, kaj la blankegaj fingroj plektitaj en la krad-vakaĵoj; kaj ŝi fiksrigardis Lucia-n, kiu venis hezite. «Respektinda patrino kaj eminentega senjorino», diris la gardanto, kun mallevita kapo, kaj la mano surbruste: «jen la povra junulino, por kiu vi al mi esperigis vian potencan protekton; kaj jen ŝia patrino».

La du prezentitaj komencis fari grandajn sinklinojn: la senjorino al ili mangestis, ke sufiĉas, kaj diris, sin turnante al la patro: «estas por mi feliĉo povi fari komplezon al niaj karaj amikoj, la kapucenaj patroj. Sed», ŝi daŭrigis: «al mi diru iom pli detale la kazon de ĉi tiu junulino, por ke mi vidu pli bone, kion fari ŝia-favore».

Lucia ruĝiĝis, kaj mallevis la kapon.

«Vi sciu, respektinda patrino...» ekparolis Agnese; sed la

gardanto per severa rigardo ĉesigis la vortojn en ŝia buŝo, kaj respondis: «ĉi tiun junulinon, eminentega senjorino, kiel mi diris, al mi rekomendas unu mia kunmonako. Ŝi devis kaŝ-fuĝi de sia vilaĝo, por eskapi el gravaj danĝeroj, kaj dum kelke da tempo ŝi bezonas rifuĝejon, kie vivi nekonate, kaj kien neniu aŭdacu veni ĝeni ŝin, eĉ se...».

«Kiaj danĝeroj?» interrompis la senjorino. «Mi petas, patro gardanto, ne diru al mi la aferon tiel enigme. Vi ja scias, ke ni, la monakinoj, ŝatas aŭdi rakontojn detale».

«Temas pri danĝeroj tiaj», respondis la gardanto, «kiajn al la ĉastegaj oreloj de la respektinda patrino konvenas nur aludeti...».

«Ho certe», rapidis diri la senjorino, iomete ruĝiĝante. Ĉu temis pri pudoro? Kiu rimarkus momentan incitiĝon, kiu akompanis tiun ruĝiĝon, tiu rajtus pridubi; des pli se kompari ĝin kun la ruĝiĝo, kiu de temp' al tempo disvastiĝis sur la vangoj de Lucia.

«Sufiĉu diri», reparolis la gardanto, «ke perforta kavaliro... ne ĉiuj mondumaj granduloj eluzas kiel via eminentega moŝto la donacojn de Dio lia-glore kaj avantaĝe al proksimuloj: perforta kavaliro, post kelktempa persekutado al ĉi tiu kreitaĵo per maldignaj logoj, konstatinte, ke ili ne efikas, aŭdakis malkaŝe persekuti ŝin perforte, tiel ke la kompatinda devis eĉ forkuri de sia hejmo».

«Proksimiĝu, junulino», diris la senjorino al Lucia, al ŝi gestante per fingro. «Mi ja scias, ke la patro-gardanto estas plej verdira homo; sed ĉi-afere neniu povas esti pli informita ol vi. Vi mem devas diri al ni, ĉu vere tiu kavaliro estis abomeninda persekutanto». Pri proksimiĝo, Lucia rapidis obei; sed respondi estis tute alia afero. Demando pri tia temo

ne ete ŝin embarasus, eĉ se ĝin farus samrangulo; dirite de tiu senjorino, kaj kun esprimo de malica dubo, ĝi forigis de ŝi ĉian kuraĝon respondi. «Senjorino... patrino... respektinda...» ŝi balbutis, kaj ŝi ne montris, ke ŝi havas alion por diri. Ĉe tio Agnese, kiel certe plej informita post Lucia, sin taksis rajtigita helpi al ŝi. «Eminentega senjorino», ŝi diris, «mi povas atesti, ke ĉi-mia filino abomenis tiun kavaliron, kiel diablo benitan akvon: aŭ pli ĝuste, diablo estis la kavaliro; sed vi bonvolos pardoni, se mi parolas aĉe, ĉar ni estas nekleraj. Fakte estas, ke ĉi-povra knabino estis promesita al nia-ranga junulo, Dio-tima kaj bon-mora; kaj se sinjoro parokestro estus el tiaj kiajn mi pensas... mi ja konscias, ke mi parolas pri religiulo, sed patro Cristoforo, amiko de ĉi tiu patro gardanto, estas religiulo kiel li, kaj li estas karitato-plena, kaj se li ĉeestus ĉi tie, li povus atesti...».

«Vi tute pretas paroli ne demandite», interrompis la senjorino, kun supereca kaj koler-plena gesto, kiu ŝin aspektigis preskaŭ malbela. «Vi silentu: mi ja scias ke gepatroj ĉiam havas respondon por doni en-nome de l' gefiloj!».

Agnese, konfuzite, turnis al Lucia okulumon, kiu signifis: vidu, kio min trafas, pro tio ke vi estas tiel embarasita. Ankaŭ la gardanto, okulumante kaj balancante la kapon, gestis al la junulino, ke estas la momento por malimplikiĝi kaj ne lasi la kompatindan panjon grundinta.

«Respektinda senjorino», diris Lucia, «tio kion diris mia patrino estas pura vero. La junulon, kiu al mi fianĉe parolis», kaj ĉe tio Lucia fariĝis tute ruĝa, «mi intencis edzigi libervole. Pardonu mian senhontan parolmanieron, sed ĝi estas, por eviti mispenson pri mia panjo. Kaj pri tiu senjoro (Dio lin pardonu!) mi morti preferus ol fali en liajn manojn. Kaj se vi

al ni faras ĉi-karitatan agon, donante al ni sekuran rifuĝon; ĉar al tio ni reduktiĝis: senhontece peti rifuĝejon, kaj ĝeni bonvirtajn homojn; sed fariĝu la volo de Dio; vi estu certa, senjorino, ke neniu povos por vi preĝi pli elkore ol ni, povraj virinoj».

«Al vi mi kredas», diris la senjorino kun mildigita voĉo. «Sed estos al mi plezure aŭskulti vin tute sola. Ne ĉar mi bezonus aliajn klarigojn, aŭ aliajn kialojn, por servi al la zorgo de la patro gardanto», ŝi tuj aldonis, sin turnante al li, kun afekta bontoneco. «Mi eĉ jam elpensis», ŝi daŭrigis, «kaj jen kion laŭ mia penso mi povas fari plej bona ĉi-momente. La monakineja farmistino antaŭ kelke da tagoj edzinigis sian lastan filinon. Ĉi-virinoj povos okupi la ĉambron, kiun ŝi lasis libera, kaj anstataŭi en la nemulte da servoj, kiujn ŝi faris. Verdire...» kaj ĉe tio ŝi gestis al la gardanto, ke li proksimiĝu al la krado, kaj daŭrigis mallaŭte: «verdire, konsidere la magrecon de l' jar-rikoltoj, oni intencis tute ne anstataŭigi tiun junulinon; sed mi mem parolos al la patrino abatino, kaj unu mia vorto... kaj pro l' zorgemo de l' patro gardanto... Entute, konsideru la aferon plenumita».

La gardanto komencis dank-esprimi, sed la senjorino interrompis lin: «ne bezonatas ceremonioj: ankaŭ mi mem, eventuale, ĉe-bezone, elprofitus la helpon de l' patroj kapucenoj. Fin-fine», ŝi daŭrigis kun rideto, kiu travidigis ion ironian kaj amaran, «fin-fine, ĉu ni ne estas fratoj kaj fratinoj?».

Tion dirinte, ŝi vokis servantan monakinon (du el tiaj estis, pro speciala privilegio, destinitaj al ŝia privata servo), kaj al ŝi ordonis informi pri tio la abatinon, kaj poste fari la oportunajn akordojn kun la farmistino kaj kun Agnese. Ŝi

forsendis ĉi-lastan, adiaŭis la gardanton, kaj retenis Lucia-n. La gardanto akompanis Agnese-n al la pordo, donante al ŝi novajn instrukciojn, kaj li iris skribi raport-leteron al la amiko Cristoforo. – Granda cerbeto, ĉi-senjorino! – li pensis en si mem sur-voje: – vere kurioza! Sed se kapabli ŝin trakti laŭ ĝusta maniero, oni efikas ĉion ajn laŭvole. Mia Cristoforo certe ne esperis, ke mi tiel baldaŭ kaj trafe lin servos. Kiel li bravas! estas neeviteble: ĉiufoje li surprenas klopodon; sed tion li faras bonintence. Bonŝance, ke ĉi-foje li trovis amikon, kiu, sen tro da bruo, sen tro da parado, sen troaj komplikaĵoj, palpebrum-rapide kondukis la aferon al feliĉa haveno. La bonkora Cristoforo ja kontentos, kaj konstatos, ke ankaŭ ni, ĉitie, taŭgas por io –.

La senjorino, kiu ĉeeste de sperta kapuceno afektis siajn gestojn kaj vortojn, kiam ŝi restis sola kun sensperta, juna kampulino, ne plu zorgis sin deteni; kaj ŝiaj paroloj iĝis iom post iom tiel strangaj, ke, anstataŭ ilin raporti, ni taksas pli oportune rakonti mallonge la antaŭan historion de tiu ĉi malfeliĉulino; sufiĉe por klarigi tion, kion ni vidis nekutima kaj mistera en ŝi, kaj komprenigi la motivojn de ŝia pli posta konduto.

Ŝi estis la lasta filino de princo ***, granda Milana nobelo, unu el la plej riĉo-havaj en la urbo. Sed lia alta konsidero pri sia rango kaŭzis ke liaj riĉaĵoj al li ŝajnis apenaŭ sufiĉaj, aŭ eĉ ne-taŭgaj, por subteni ties pompon; kaj li aplikadis sian tutan zorgon, por gardi ilin samkvantaj kaj ĉiam-daŭre unuecaj. La historio ne diras specife, kiom da filoj li havis; ĝi nur komprenigas, ke li destinis al monaka vivo ĉiujn postnaskitajn filojn kaj filinojn, por lasi la tutan heredaĵon ekskluzive al la unua naskito, siavice destinita gardi

la familion, tio estas naskigi gefilojn, por same sin turmenti, ilin turmentante. Kiam nia malfeliĉulino estis ankoraŭ kaŝita en la patrina ventro, ŝia vivo-stato jam estis senrevoke fiksita. Restis nur decidote, ĉu ŝi estos monako aŭ monakino, decido por kiu necesis ne ŝia konsento, sed ŝia ĉeesto. Kiam ŝi naskiĝis, la princo patro, por doni al ŝi nomon, kiu tuj estigu ideon pri klostro, kaj kiu apartenis al nobel-genta sanktulino, nomis ŝin Gertrude⁶. Pupoj monakine vestitaj estis la unuaj ludiloj al ŝi en-manigitaj; pli poste sanktaj bildoj kun monakinaj figuroj; kaj tiajn donacojn ĉiam akompanis grandaj rekomendoj gardi ilin tute zorge, kiel valoraĵojn, kaj la aserta demando: «Ja bela, ĉu?». Kiam la princo, aŭ la princino, aŭ la princido, kiu sola inter la virseksaj filoj estis edukata hejme, intencis laŭdi la floran aspekton de la knabineto, ili ŝajnis ne trovi alian esprim-manieron, krom la vortojn: «kia patrino abatino!». Neniu tamen klare diris al ŝi: vi devas monakiniĝi. Ĝi estis ideo subkomprenata, kaj aludata preterfluge, en ĉia parolo koncerne ŝian estontan destinon. Se foje Gertrunjo troigis per iom aroganta kaj superregema konduto, al kio ŝia temperamento tre facile inklinis: «vi estas knabineto», oni al ŝi diris: «ĉi-manieroj al vi ne konvenas: kiam vi estos patrino abatino, tiam vi ordonos per vergo, kaj faros ĉion laŭplaĉe». Aliajn fojojn la princo, ŝin riproĉante pro aliaj tro liberaj kaj tro familiaraj agmanieroj, kiujn sammaniere ŝi al si permesis, «he! he!» al ŝi diris: «ĉi tia konduto ne estas laŭ via rango: se vi volas iam ricevi konvenan respekton, ek de nun lernu regi vin mem: memoru ke en la monakinejo vi devos esti ĉiuflanke unuaranga; ĉar nobelan sangon oni kunportas ĉien ajn».

Ĉiuj ĉi-specaj vortoj stampis en la cerbon de la knabineto

⁶ Gertrude: nomo de pluraj mezepokaj nobelrangaj sanktaj monakinoj.

la ideon, ke ŝi nepre devas esti monakino; sed la diroj el la buŝo de l' patro efikis pli multe ol ĉiuj ceteraj. La kutima sinteno de la princo estis tiu de rigora mastro; sed se temi pri l' estonta stato de l' gefiloj, el lia vizaĝo kaj el ĉiu lia vorto sentebliis senŝancela rezoluteco, ofendsenta ĵaluza komandemo, kiu stampis en onin la senton pri fatala neceso.

Apenaŭ ses-jara, la eta Gertrude estis lokita, por eduko kaj pli multe por survojigo al la trudita vokiĝo, en la monakinejo, kie ni ŝin vidis; kaj la elekto de la loko ne estis hazarda. La bonkora gvidanto de la du virinoj diris, ke ŝia patro estas unuaranga en Monza, kaj, kunmetante tiun ĉi ajnan ateston kun aliaj indikoj, kiujn la anonima aŭtoro ie kaj tie senpripense ellasas, ni povas eĉ aserti, ke li estis feŭdestro de tiu loko. Ĉiuokaze li ĝuis tie grandegan aŭtoritaton; kaj li pensis, ke lia filino tie pli ol aliloke estos traktata kun tiaj distingoj kaj favoroj, kiuj pli multe ŝin logos elekti tiun monakinejon kiel sian por-ĉiaman restadejon. Kaj li ne trompiĝis: la abatino kaj kelke da agemaj monakinoj, tenantaj tiel-dire la kaĉ-miksilon, jubilis, vidante ke oni al ili havigas garantiaĵon de protekto tiel utilan ĉiuokaze, tiel gloran ĉiumomente; ili do akceptis la proponon kun dankesprimoj ne troigitaj kvankam grandegaj; kaj ili tute respondis al la intencoj, kiujn la princo subkomprenigis, pri definitiva loĝigo de la filino: intencoj tute akordaj kun la iliaj. Gertrude, apenaŭ enirinte en la monakinejon, estis nomita antonomazie⁷ la senjorineto; distinga loko ĉe-table kaj en dormejo; ŝia konduto proponata al la aliaj kiel modela; bombonoj kaj karesoj senfinaj kaj kondimentitaj per tiu respektama familiareco, kiu tiom flatas la infanojn, kiam ili ĝin konstatas ĉe homoj, kiuj

⁷ *antonomazie*: anstataŭ propra nomo.

kutime traktas la ceterajn infanojn kun supereco. Verdire ne ĉiuj monakinoj konspiris allogi la povrulinon en la kaptilon: multe da ili estis simplaj kaj for de ĉia intrigo, kaj ilin eĉ naŭzus la penso oferi filinon por profiteblaj celoj; sed ĉi tiuj, tute atentaj pri siaj apartaj okupoj, parte ne klare rimarkis tiujn manovrojn, parte ne konsciiĝis kiom da malico estas ĉe tio, parte rezignis esplori la aferon, parte silentis, por ne kaŭzi senutilajn skandalojn. Kelkiu, memorante ke ŝi mem per tiaj artifikoj estis siatempe kondukita al tio, pri kio ŝi pentis pli poste, eĉ kompatis la povran senkulpulinon; kaj ellasis siajn sentojn farante al ŝi tenerajn, melankoliajn karesojn; sed ĉi-lastaj estis tute for de la suspekto, ke subestas mistero; kaj la afero pluiris. Kaj ĝi irus tiele ĝisfine, se Gertrude estus ununura knabino en tiu monakinejo. Sed inter la kunulinoj tie edukataj, kelkaj sin konsciis destinitaj al geedziĝo. Gertrunjo, nutrite per koncepto pri sia supereco, parolis grandioze pri sia estonta destino de abatino, de monakineja princino, ŝi tute volis vidi sin enviata de la aliaj; kaj kun miro kaj koler-sento ŝi konstatis, ke kelke el ili tute ne envias. Al la bildoj grandiozaj, sed limigitaj kaj malvarmaj, devenontaj el unuarangeco en monakinejo, ili kontraŭmetis la diversajn, brilajn bildojn pri nuptoj, bankedoj, konversacioj, festenoj, somerumoj, vestaĵoj, kaleŝoj. Tiaj bildoj estigis en Gertrude eksciton kaj mensan svarmadon, kian estigus granda korbo da ĵus plukitaj floroj antaŭ abelujo. Ŝiaj gepatroj kaj edukantinoj kultivis ŝian naturan vantecon, por al ŝi plaĉigi la klostron; sed kiam tiun vantecon ekscitis ideoj des pli kongruaj kun ĝi, ŝi sin ĵetis sur ilin kun tute pli viva kaj pli spontana ardo. Por ne resti sub siaj kunulinoj, kaj samtempe sekvi sian novan inklinon, ŝi respondis, ke entute neniu rajtas meti monakinan

vualon sur ŝian kapon sen ŝia konsento, ke ankaŭ ŝi povas edziniĝi, loĝi en palaco, ĝui la mondumon, eĉ pli bone ol ĉiuj; ke ŝi tion ja povas, se ŝi volus, ke ŝi volos, ke ŝi volas; kaj ŝi volis, fakte. La ideo, ke ŝia konsento estas necesa, ideo antaŭe preskaŭ ne-rimarkita kaj kvazaŭ kuntirita en angulo de ŝia menso, tiam disvolviĝis kaj manifestiĝis en sia tuta graveco. Tiun ideon ŝi help-vokis ĉiumomente, por pli trankvile ĝui la imagojn pri agrabla estonteco. Tamen ĉiufoje, malantaŭ tiu ideo, nepre aperis alia: nome ke tiun konsenton ŝi devus rifuzi al la princo patro, kiu konsideris aŭ ŝajnis konsideri la konsenton kiel jam donitan; kaj ĉe tiu ideo la animo de la filino estis tute for de la sekureco, kiun ŝiaj vortoj afektis. Tiam ŝi komparis sin kun la kunulinoj, kiuj estis tute pli certaj pri sia estonto, kaj kun ĉagreno ŝi konstatis ke, anstataŭ esti de ili enviata, ŝi mem envias ilin. Enviante, ŝi malamamis ilin; foje la malamo ellasiĝis per spitaĵoj, per malafablaĵoj, per pikaj diroj; aliffoje la sameco de inklinoj kaj esperoj kvietigis tiun malamon kaj estigis ŝajnnan kaj momentan intimecon kun ili. Foje, por ĝui almenaŭ momente ion efektivan kaj aktualan, ŝi plezuriĝis je la privilegioj al ŝi havigataj, kaj sentigis al la aliaj sian superecon; foje, ne povante plu elteni la izolecon de siaj timoj kaj deziroj, ŝi tute humile iris serĉi tiujn knabinojn, kvazaŭ por petegi bonvolon, konsilojn, kuraĝon. Tra ĉi tiaj mizeraj bataletoj kun si mem kaj kun la aliaj, ŝi transis la infanaĝon kaj eniris tiun krizan aĝon, dum kiu ŝajnas ke en la animon eniras kvazaŭ mistera potenco, kiu levas, ornamas, fortikigas ĉiujn inklinojn, ĉiujn ideojn, kaj foje ilin transformas, aŭ turnas al neatendita direkto. Ĝis tiam, objekto de l' revoj de Gertrude estis la eksteraj brilo kaj pompo: ek de tiam, io tenera kaj amsenta, antaŭe dismetita nur leĝere kaj

kvazaŭ nebule, komencis disvastiĝi kaj ĉef-rolu en ŝiaj revoj. En la plej sekreta parto de la menso, ŝi al si konstruis kvazaŭ brilajn izolejonojn: tien ŝi rifuĝis for de la aktualaj objektoj, tie ŝi gastigis certajn rolulojn, strange kunmetitajn el konfuzaj infan-aĝaj memoroj, el la malmulto, kiun ŝi sukcesis vidi pri la ekstera mondo, kaj el tio kion ŝi lernis el la paroloj de la kunulinoj; kun tiuj roluloj ŝi restis, al ili ŝi parolis, kaj ilia-nome al si respondis; tie ŝi donis ordonojn kaj ricevis ĉiuspecajn omaĝojn. De tempo al tempo la religiaj pensoj venis ĝeni tiujn brilajn kaj lacigajn festojn. Sed la religio, kia ĝi estis instruita al nia povrulino, kaj kia ŝi ĝin lernis, ne forigis orgojlon, ĝi eĉ sanktigis ĝin, kaj ĝin proponis rimedo por akiri surteran feliĉon. Senigite je sia esenco, ĝi ne plu estis religio, sed revaĵo, kiel la ceteraj. En la intertempoj, dum kiuj tiu revaĵo ĉefrolis kaj gigantis en la menso de Gertrude, la povrulino, venkite de konfuzaj teruroj, kaj regate de konfuzasento pri devoj, imagis, ke ŝia malinklino al klostro kaj ŝia rezisto al la premoj de l' gepatroj por la elekto de l' vivo-stato, estas peko; tial ŝi en sia koro promesis pentofari per libervola enfermiĝo en klostro.

Tiuepoke validis eklezia leĝo, ke junulino ne rajtas akceptiĝi kiel monakino antaŭ ekzameno fare de ekleziulo, nome vikario de l' monakinoj, aŭ de alia pastro ĉi-celekomisiita, por certiĝi, ke libervole ŝi eniras monakinejon: kaj tia ekzameno povis okazi nur unu jaron post kiam ŝi esprimis per skriba peto al tiu vikario la deziron monakiniĝi. La monakinoj surprinentaj la mallaŭdindan taskon efiki ke Gertrude sin devigu por ĉiam kiel eble plej malkonscie, eluzis unu el la momentoj, kiajn ni diris, por ke ŝi transskribu kaj subskribu tian peticion. Kaj por pli facile persvadi ŝin, ili ne

evitis diri kaj rediri al ŝi, ke entute estas nur formalajaĵo, kiu povos efiki nur per pli postaj elpaŝoj, dependaj de ŝia volo (kaj tio estis vero). Tamen, eble antaŭ ol la peticio atingus la adresaton, Gertrude jam pentis, ke ŝi subskribis ĝin. Poste ŝi pentis pri sia pento, tiel trapasante tagojn kaj monatojn en senĉesa sinsekvo de kontraŭaj sentoj. Longtempe ŝi kaŝis al la kunulinoj tiun elpaŝon, jen pro timo elmeti al kontraŭdiroj bonvirtan decidon, jen pro honto malkaŝi fuŝaĵon. Fine venkis la deziro elverŝi siajn sentojn, kaj serĉi konsilon kaj kuraĝigon. Validis alia eklezia leĝo, laŭ kiu junulino rajtis prezenti sin por tia ekzameno pri vokiĝo, nur post almenaŭ unu-monata restado ekster la monakinejo, en kiu ŝi estis edukita. Jam forpasis unu jaro post kiam ŝi sendis la peticion; kaj Gertrude ricevis avizon, ke post ne-multe ŝi estas forsendota de la monakinejo kaj kondukota en la gepatran domon, por tie resti tiun monaton, kaj fari ĉiujn elpaŝojn necesajn, por fini tion, kion ŝi fakte jam komencis. La princo kaj ceteraj familianoj konsideris ĉi-ĉion kiel certan, kvazaŭ jam okazintan; sed la junulino havis en la kapo tute alian aferon: anstataŭ fari pluajn paŝojn, ŝi cerbumis rimedon por revoki la unuan. En tiel prema situacio, ŝi decidis malfermi sian koron al unu el siaj kunulinoj, la plej liber-parola kaj ĉiam preta doni rezolutajn konsilojn. Tiu al ŝi sugestis informi la patron pri sia nova decido per letero, ĉar ŝi ne kuraĝis al li brave diri en-vizaĝen: mi ne volas! Kaj ĉar senpaga konsilo en ĉi-mondo estas raraĵo, la konsilantino pagigis la konsilon per multe da moko super ŝia sentaŭgeco. La letero estis kombinita helpe de kvar aŭ kvin konfidenculinoj, estis skribita kaŝe, kaj havigita al la adresato per lerte elpensitaj artifiko. Gertrude restis tre anksia, atendente respondon, kiu neniam alvenis. Nur

tio, ke post nemulte da tagoj la abatino venigis ŝin en sian ĉelon, kaj afektante misteron, abomenon kaj kompaton, al ŝi obskure aludis grandan koleron de l' princo pro misfaro, kiun konjekteble ŝi faris, tamen komprenigante ke, se bone konduti, ŝi povas esperi ke ĉio estas forgesota. La junulino komprenis, kaj ne aŭdacis demandi pli multe.

Venis fin-fine la tago tiom timata kaj sopirata. Kvankam Gertrude sciis, ke ŝi iras al batalo, tamen la eliro el la monakinejo, la forlaso de tiuj muroj, inter kiuj ŝi restis ok jarojn enfermita, la kaleŝado tra l' aperta kamparo, la revido de la urbo, de la hejmo, estis travivaĵoj plenaj de tumulta ĝojo. Koncerne batalon, la povrulino, gvidate de tiuj konfidenculinoj, jam decidis la rimedojn, jam preparis tiel dire sian planon. – Aŭ oni provos devigi min perforte, – ŝi pensis, – kaj mi estos neŝancelebla; mi estos humila, respektama, sed ne konsentos: mi nur devas ne diri pluan jeson, kaj mi ĝin ne diros. Aŭ oni min traktos milde, kaj mi estos eĉ pli milda; mi ploros, petegos, ekscitos ilian kompaton: entute mi nur postulas, ke oni ne oferu min. – Sed, kiel ofte okazas ĉe tiaj prognozaj, neniu el la du aferoj efektiviĝis. Pasis tagoj, sen ke la patro aŭ aliaj al ŝi parolus pri la peticio, nek pri ties malkonfirmo, aŭ ke oni farus al ŝi ajnan proponon, nek per karesoj nek per minacoj. La gepatroj estis kun ŝi seriozaj, malĝojaj, sever-mienaj, neniam dirante al ŝi la kialon. Nur evidentis, ke ili konsideras ŝin kulpa, malinda: ŝajnis, kvazaŭ mistera anatemo⁸ pezus sur ŝi, kaj ŝin apartigus disde la familio, lasante ŝin ligita nur kiom necese por ke ŝi sentu sian subecon. Malofte, kaj nur je difinitaj horoj, oni ŝin allasis al kunuleco kun la gepatroj kaj la unue-naskita frato. Ŝajnis,

⁸ *anatemo*: malbeno, ekskomuniko.

kvazaŭ regus en la triopo granda konfidenco, kiu pli multe sentigis kaj ĉagrenis la forlasitecon de Gertrude. Neniu ŝin alparolis; kaj kiam ŝi timeme aŭdacis eldiri ne tute necesan vorton, ĝi restis tute senresponda, aŭ oni al ŝi respondis per rigardo senatenta, aŭ malŝata, aŭ severa. Kaj se, ne plu eltenante tian amaran kaj humiligan diskriminacion, ŝi insistis, kaj provis familiariĝi; se ŝi almozpetis iom da amemo, tuj ŝi aŭdis tuŝi, ne-rette sed klare, tiun temon pri elekto de l' vivo-stato; oni al ŝi kaŝe sentigis, ke ja ekzistas rimedo, por reakiri la amemon de la familio. Tiam Gertrude, kiu ne ĝin volis tiukondiĉe, devis retiriĝi, preskaŭ rifuzi la sopiritajn unuajn signojn de bonvolo, kaj repreni sian rolon de ekskomunikito; kaj en tio eĉ aspekti kvazaŭ kulpulino.

Tiaj travivaĵoj de aktualaj objektoj ĉagrene kontrastis kun la gajaj imagoj, pri kiuj Gertrude tiom multe okupiĝis antaŭe, kaj ankoraŭ okupiĝis en la sekreto de sia menso. Ŝi estis esperinta, ke en la brila, tre vizitata gepatra domo, ŝi povos ĝui almenaŭ kelkan realan specimenon de la imagitaj aferoj; sed ŝi tute elreviĝis. La izoliteco estis rigora kaj tuteca, kiel en la monakinejo; pri promenoj oni eĉ ne parolis; kaj la tribunon,⁹ kiu el la hejmo malfermiĝis internen de apuda preĝejo, forigis eventualan ununuran neceson eliri. La kompanio estis pli malĝoja, pli malvasta, pli monotona ol en la monakinejo. Ĉe ĉiu anonco de vizito, Gertrude devis alsupri al la lasta etaĝo, kaj enfermiĝi kun maljunaj servistinoj: kaj tie ŝi eĉ tagmanĝis, kiam en la domo okazis bankedo. La servistoj konformiĝis, koncerne manierojn kaj parolojn, kun la ekzemploj kaj intencoj de la gemastroj; kaj Gertrude, kiu laŭ sia

⁹ *tribuno*: galerio malfermita super la interno de preĝejo: tio ebligis partopreni diservon restante hejme.

temperamento emus ilin trakti kun senjoreca familiareco, kaj, en sia aktuala stato, estus danka, se ili iel esprimus amemon al ŝi kvazaŭ al sam-rangulo, reduktiĝis eĉ almozpeti ĝin; tial ŝi restis humiligita kaj pli kaj pli afliktita, vidante sin reciprokata per malkaŝa senzorgo, kvankam akompanata de apenaŭ formala omaĝemo. Tamen ŝi nepre rimarkis, ke unu paĝio, tute malsame ol tiaj uloj, por ŝi havis respekton kaj sentis tute specialan kompaton. La sinteno de tiu junuleto estis, el tio kion Gertrude iam ajn vidis, plej simila al la revoj longe kontemplataj en ŝia fantazio, al la sinteno de ŝiaj idealaj imagitoj. Iom post iom, oni malkovris en la konduto de la knabino ion novan, nekutimajn trankvilon kaj malkvieton, kvazaŭ ŝi estus trovinta ion ŝategatan, kiun ŝi mem volus kontempli ĉiumomente, kaj forkaŝi de aliuloj. Oni ŝin observis pli ol iam ajn: hazarde iun matenon unu el tiuj ĉambristinoj ŝin surprizis tutrapide faldi paperon, sur kiu preferindus se ŝi skribus nenion. Post mallonga distirado, la papero restis en la manoj de la ĉambristino, kaj de ili ĝi pasis en tiujn de l' princo.

Ne eblas priskribi nek imagi la teruron de Gertrude, ĉe l' bruo de liaj paŝoj: temis pri tia patro, li estis kolera, kaj ŝi sentis sin kulpa. Sed kiam ŝi vidis lin aperi, kun tia rigardo, tenante tian paperon enmane, ŝi preferus esti cent metrojn subtere, des pli en-klostre. Liaj vortoj estis nemultaj, sed teruraj: kiel tujan punon li ordonis enfermi ŝin en tiu ĉambro, sub gardado de la virino farinta tiun malkovron; sed tio estis nur komenco, nur momenta rimedo; tiuj vortoj promesis kaj nebule konjektigis alian obskuran, nedifinitan, kaj do pli teruran punon.

Memkompreneble la paĝio tuj estis eldomigita; kaj ankaŭ

li mem minacita pri io terura, se iam ajn li aŭdacus ion aludeti pri l' okazinto. Kune kun tia ordonego, la princo al li donis du bruajn vangofrapojn, por kunligi kun tiu aventuro memoron, kiu forigu de la knabaĉo ĉian tenton fanfaroni pri ĝi. Ne malfacilis trovi pretekston, por pravigi maldungon de l' paĝio; koncerne la filinon, oni deklaris, ke ŝi malbonfartas.

Ŝi do restis kun angoro, kun honto, kun rimorso, kun teruro pri estonteco, nur kune kun tiu virino, kiun ŝi malamis kiel atestanton de ŝia kulpo, kaj kaŭzon de ŝia malfeliĉo. La virino siavice malamis Gertrude-n, pro kiu oni ŝin devigis al la malaminda rolo de karceristino, ne sciate kiom longe, kaj de porĉiama gardanto de danĝera sekreto.

La unua konfuzata tumulto de tiuj sentoj iom post iom kvietiĝis; sed ili, revenante po unu en la animon, tie pligrandiĝis kaj haltis, por ĝin turmenti pli distinge kaj komforte. Kio do povos esti tiu enigme minacita puno? Multaj, diversaj, kaj strangaj punoj prezentiĝis al la arda kaj sensperta fantazio de Gertrude. La puno laŭ ŝi plej verŝajna estis, ke oni ŝin rekondukos en la monakinejon de Monza, ŝi reaperos tie ne plu kiel la senjorineto, sed kiel kulpulino, kaj tie ŝi restos enfermita, nesciate ĝis kiam! kun kia trakto-maniero! En tia dolor-plena imagado, ŝin plej ĉagrenis la honto-sento. La frazoj, la vortoj, la komoj de tiu damnita papero obsedadis ŝian memoron: ŝi imagis ilin esplorataj, pesataj de leganto tiel neatendita, tiel malsama ol la adresato; ŝi imagis, ke ili povos trafi ankaŭ en la okulojn de la patrino aŭ de la frato, aŭ de nesciate kiu alia: kaj, kompare kun tio, ĉio cetera aspektis preskaŭ bagatela. Ankaŭ la imago de la unua fonto de la tuta skandalo ne evitis ofte veni obsedi la povran malliberulinon: kaj vi imagu, kiel strange aspektis tiu fantomo

inter ceteraj, tiel malsamaj ol li: seriozaj, malvarmaj, minacemaj. Sed ĝuste pro tio, ke ŝi ne povis disigi lin de ili, nek reveni al tiuj momentaj plezuriĝoj, sen tuja reapero de l' konsekvencaj aktualaj ĉagrenoj, ŝi komencis iom post iom reveni malpli ofte al li, repuŝi lian memoron, malkutimiĝi je li. Nek pli longe aŭ pli volonte ŝi haltis ĉe la iamaj gajaj kaj brilaj fantaziaĵoj: tro multe ili kontrastis kun la aktualaj cirkonstancoj, kaj kun ĉia verŝajna estonto. La ununura ne-aera kastelo, en kiu Gertrude povus imagi trankvilan kaj honoran rifuĝejon, estis la monakinejo, se eventuale ŝi decidus eniri ĝin por ĉiam. Tia decido sendube ĝustigus ĉian aferon, elpagus ĉian ŝuldon, kaj subite ŝanĝus ŝian situacion. Kontraŭ tia intenco verdire leviĝis ŝiaj dumvivaj pensoj: sed nun la cirkonstancoj estis malsamaj; kaj, en la abismo, en kiun Gertrude estis falinta, kaj kompare kun tio, kion foje ŝi timis, la stato de akklamata, omaĝata kaj obeata monakino, ŝajnis al ŝi sukeraĵo. Du tute diversaj sentoj de tempo al tempo kontribuis malpliigi ŝian iaman malinklinon: foje la rimorso pro la farita fuŝaĵo, kaj fantazia tenera devoteco; foje la orgojlo agacita per la manieroj de la gardistino, kiu (verdire ofte provokite de ŝi mem) venĝis, jen timigante ŝin pri la minacita puno, jen hontigante ŝin pri l' misfaro. Kaj kiam ŝi volis montri sin bonvola, ŝi afektis protektemon eĉ pli malamindan ol insulto. En tiaj diversaj okazoj, la deziro de Gertrude eskapi el ties ungegoj, kaj aperi antaŭ ŝi kun rolo supera al ŝiaj kolero kaj kompato, tiu daŭra deziro fariĝis tiel viva kaj akra, ke ŝajnis al ŝi agrabla ĉio ajn, kio kondukos al ties kontentigo.

Post kvar aŭ kvin longaj karcer-tagoj, iun matenon, Gertrude, naŭzite kaj plej iritite pro unu el la spitaĵoj de la gardistino, rifuĝis en angulon de la ĉambro, kaj tie, kun la

vizaĝo kaŝita intermane, ŝi restis kelktempe, vorate de kolero. Tiam ŝi eksentis fortegan bezonon vidi aliajn vizaĝojn, aŭdi aliajn vortojn, esti traktata alimaniere. Ŝi pensis pri la patro, pri la familio, kaj la penso retiriĝis terurite. Sed ŝi ekpensis, ke trovi ilin amikoj dependas de ŝi; kaj ŝi eksentis subitan ĝojon. Post ĝi, ŝi sentis eksterordinarajn konfuzon kaj penton pri l' misfaro kaj same fortan deziron elpagi ĝin. Verdire ŝia volo ne tute fiksiĝis al tiu intenco, sed neniam antaŭe ŝi aliĝis al ĝi tiom arde. Ŝi leviĝis de tie, iris al la tablo, reprenis tiun fatalan plumon, kaj skribis al la patro leteron plenan de entuziasmo kaj deprimiĝo, de aflikto kaj espero, petegante pardonon, kaj sin montrante senkondiĉe dispona al ĉio ajn, kio al la pardononto plaĉos.

X

Okazas momentoj, dum kiuj speciale la animo de junuletoj estas tiel dispona, ke ĉia plej eta instigo sufiĉas, por elpeti ĉion ajn, kio aspektas bonfara kaj ofera: samkiel ĵus elburĝoninta floro milde sin delasas sur sia febla tigo, preta donaci sian parfumon al la unua venteto, kiu ĉirkaŭ ĝi blovetas. Ĝuste tiajn momentojn, kiujn aliuloj devus admiri kun timema respekto, la profitema ruzo atente gvatas kaj tuj elprofitas, por kateni volon, kiu ne sin gardas.

Legante tiun leteron, princo *** tuj ekvidis breĉeton malfermita por siaj iamaj kaj ĉiamaj intencoj. Li anoncigis al Gertrude, ke ŝi venu al li; kaj li sin disponis tieldire forĝ-bati la feron, dum ĝi inkandeskas. Gertrude aperis kaj, ne levante l' okulojn al la patra vizaĝo, sin ĵetis surgenuen antaŭ li, kaj havis apenaŭ spiron por diri: «pardonon!». Li al ŝi gestis, ke ŝi leviĝu; sed, kun ne tre kuraĝiga tono, li respondis, ke ne sufiĉas pardonon deziri, nek peti: ke tio estas afero tro facila kaj natura ĉe ĉiu ajn, kiu estas kulpa kaj timas punon; ke entute necesas ĝin meriti. Humile kaj treme, Gertrude demandis, kion ŝi faru. La princo (ĉi-momente nia koro ne eltenas nomi lin patro) ne respondis rekte, sed komencis longan parolon pri la misfaro de Gertrude; kaj tiuj vortoj brulumis sur la animo de la povrulino, kiel frotado de malglata mano sur vundo. Li daŭrigis, dirante ke, eĉ se... eventuale... li estus havinta intencon ŝin allasi al la mondo, nuntempe ŝi mem intermetis nesupereblan malhelpon; ĉar li, kiel honorinda kavaliro, neniam kuraĝus liveri al honestulo fraŭlinon, kiu tian prov-pruvon donis pri si mem. La mizera aŭskultantino sentis sin neniigita: tiam la princo, mildigante iom post iom la voĉon kaj la vortojn, daŭrigis, dirante ke tamen por ĉia misfaro

troveblas rimedo kaj mizerikordo; ke ŝia misfaro estas el tiaj, kies rimedo estas klare indikita: ŝi devus rigardi tiun bedaŭrindan akcidenton kvazaŭ averton, ke la monduma vivo estas por ŝi tro danĝera...

«Ha jes!» elkriis Gertrude, skuite per la timo, preparite per la honto, kaj tiu-momente instigite de subita tenereco.

«Ha! vi mem tion komprenas», tuj reparolis la princo. «Nu, oni ne plu menciuj la paseon: ĉio estas forviŝita. Vi faris la ununuran honorindan, konvenan elekton, kiu al vi restis; sed ĉar vi tion elektis volonte kaj bonmaniere, estas mia tasko igi ĝin ĉiumaniere kaj ĉiuflanke al vi agrabla; estas mia tasko fari ke la tuta avantaĝo kaj merito apartenu al vi. Mi mem surprenas la zorgon por tio». Post tiuj vortoj li svingis tintilon, kiu staris surtable, kaj al la enirinta servisto li diris: «la princino kaj la princido tuj ĉi tien!». Kaj kun Gertrude li daŭrigis: «mi volas al ili komuniki mian ĝojon; mi volas ke ĉiuj komencu trakti vin laŭkonvene. Vi parte spertis la severan patron; sed ek de nun vi tute sentos la amoplenan».

Ĉe tiuj vortoj, Gertrude estis kvazaŭ konsternita. Jen ŝi sin demandis, kial do tiu jeso, senpripense elbuŝigita, povas akiri tiom gravan signifon; jen ŝi esploris, ĉu iel eblas revoki ĝin, redukti ĝian sencon; sed la konvinko de la princo aspektis tiel tuteca, lia ĝojo tiel ĵaluza, lia bonvolo tiel kondiĉa, ke Gertrude aŭdacis diri eĉ ne unu vorton, kiu povus tiujn sentojn minimume ŝanceli.

Post kelke da momentoj, la du vokitoj alvenis, kaj, vidante tie Gertrude-n, ili rigardis ŝian vizaĝon hezite kaj mire. Sed la princo, kun gaja kaj am-esprima mieno, kiu preskribis ke ili imitu ĝin, «jen», li diris, «la erarinta ŝafo: kaj ĉi tiu estu la lasta mencio pri ĉagrenaj memoroj. Jen la ĝojo de

la familio. Gertrude ne plu bezonas konsilojn; tion, kion ni deziris por ŝia avantaĝo, ŝi mem elektis libere. Ŝi estas decidinta, ŝi al mi komprenigis, ke ŝi estas decidinta...». Ĉe tio ŝi levis al la patro teruritan kaj peteman rigardon, kvazaŭ por petegi, ke li interrompu, sed li senĝene daŭrigis: «ke ŝi estas decidinta surpreni monakinan vualon».

«Brave! bone!» elkriis unuvoĉe la patrino kaj la filo, kaj ambaŭ laŭvice brakumis Gertrude-n, kiu akceptis tiujn elmontrojn kun larmoj, kiujn oni interpretis kiel esprimon de kontento. Tiam la princo parolis longe, por klarigi, kion li faros, por igi la sorton de la filino gaja kaj grandioza. Li parolis pri la distingoj, kiujn ŝi ĝuos en la monakinejo kaj la urbeto; ke tie ŝi estos kiel princino, kiel reprezentanto de la familio; ke tuj kiam la aĝo tion rajtigos, ŝi leviĝos al la unua rango; kaj intertempe ŝia submetiĝo estos nur formala. Ĉiumomente la princino kaj la princido renovigis gratulojn kaj aplaŭdojn; Gertrude-n regis kvazaŭa sonĝo.

«Poste konvenos fiksi la tagon, por veturi al Monza, kaj prezenti la peticion al la abatino», diris la princo. «Kiel ŝi kontentos! Mi povas vin certigi, ke la tuta monakinejo tute ŝatos la honoron, kiun Gertrude al ĝi faras. Eĉ... kial ne tien veturi hodiaŭ? Gertrude ĝuos volonte iom da libera aero».

«Ni ja iru», diris la princino.

«Mi iras ordoni», diris la princido.

«Sed...» elbuŝigis mallaŭte Gertrude.

«Trankvile, trankvile!» reparolis la princo: «ŝi mem decidu: eble hodiaŭ ŝi ne sentas sin sufiĉe dispona, kaj ŝi preferas atendi ĝis morgaŭ. Diru: ĉu vi volas, ke ni iru hodiaŭ aŭ morgaŭ?». «Morgaŭ», respondis tute mallaŭte Gertrude, al kiu ŝajnis, ke ŝi ion profitas, gajnante iom da tempo.

«Morgaŭ!» solene deklaris la princo: «ŝi decidis, ke oni iru morgaŭ. Dume mi iras al la vikario pri l' monakinoj, por fiksi la ekzamen-tagon». Tuj dirite, tuj farite: la princo eliris, kaj vere iris (tio estis ne bagatela degno) al la menciita vikario; kaj ili akordiĝis, ke li venos post du tagoj.

Dum la cetera parto de tiu tago Gertrude havis eĉ ne unu liberan minuton. Ŝi deziris ripozigi l' animon el tiom da emocioj; lasi, tiel dire, ke ŝiaj pensoj klariĝu; konsciĝi, kion do ŝi faris, kaj kio restas por fari; sciiĝi kion do ŝi volas; malakceli momente tiun maŝinon, kiu, startigite, iradis tiel rapidege; sed tute ne eblis. La okupoj seninterrompe sekvis unu la alian, kunplektiĝis unu kun la alia. Tuj post foriro de la princo, ŝi estis kondukita en la tualetejon de la princino, por esti, sub ŝia gvidado, kombita kaj vestita de ties ĉambristino. Ŝi ankoraŭ ne estis finordigita, kiam oni avizis ilin, ke estas surtabligite. Gertrude pasis inter la sinklinoj de la servistaro, kiu esprimis gratulojn por ŝia resaniĝo, kaj ŝi trovis kelkajn plej proksimajn parencojn, lastmomente invititajn, por honori kaj gratuli ŝin pro ambaŭ eventoj: reakirita sano kaj deklarita vokiĝo.

La nuptulino (tiel oni nomis la kandidatajn monakinojn, kaj per tiu titolo ĉiuj salutis Gertrude-n ĉe ŝia apero), la nuptulino devis multe diri kaj fari por respondi al la komplimentoj, kiuj ŝin trafis ĉiuflanke. Ŝi ja sentis, ke ĉiu respondo estas kvazaŭ akcepto kaj konfirmo; sed kiel respondi alimaniere? Ne multe post leviĝo el manĝo-tablo, venis la horo de l' kaleŝ-trotado. Gertrude enkaleŝiĝis kun la patrino kaj du onkloj partoprenintaj en la festeno. Post kutima ĉirkaŭveturo, oni atingis Marina-straton, kiu tiam trais la spacon nun okupitan de la publika ĝardeno, kaj estis la loko,

kien senjoroj alkaleŝis, por ripozi el la tago-penoj. La onkloj al Gertrude parolis, kiel konvenis en tia tago; kaj unu el la duopo, kiu pli ol la alia ŝajnis koni ĉiun homon, ĉiun kaleŝon, ĉiun livreon, kaj ĉiumomente havis ion por diri pri tiu senjoro aŭ ĉi tiu senjorino, abrupte sin turnis al ŝi, kaj diris: «ha, eta ruzulino! vi pied-batas ĉiujn ĉi stultaĵojn; vi estas ja ruzega; vi forlasas en implikoj nin, mizerajn mondanojn, kaj vi retiriĝas, por vivi beate, kaj alsupras al la paradizo en komforta kaleŝo».

Ĉe l' vesperiĝo oni revenis hejmen; kaj la servistoj, desuprante rapide kun torĉoj, informis ke multe da gastoj atendas. La sciigo jam diskuris; kaj parencoj kaj amikoj venis plenumi sian devon. Oni eniris la konversaciejon. La nuptulino estiĝis ties idolo, amuzilo kaj viktimo. Ĉiu ŝin deziris ĉe si: unu petis ke ŝi promesu dolĉaĵojn, dua promesis al ŝi vizitojn, tria parolis pri monakino tiu-tia, sia parencino, kvara pri monakino tiu-alia, konatino, alia laŭdis la klimaton de Monza, alia grand-guste diradis kiel grandioze ŝi imponos tie. Aliaj, ankoraŭ ne sukcesinte proksimiĝi al Gertrude, tiel sieĝata, gvatis la oportunon, por sin prezenti, kaj sentis kvazaŭ rimorson, ĝis ili sian devon plenumos. Iom post iom la societo disiĝis; ĉiuj foriris senrimorse, kaj Gertrude restis sola kun la gepatroj kaj la frato.

«Finfine», diris la princo, «mi havis la ĝojon vidi mian filinon traktata laŭ ŝia rango. Sed oni devas konfesi, ke siaflanke ŝi mem kondukis bonege, kaj montris, ke ŝi kapablos ĉefroli senĝene, kaj subteni la dignon de la familio».

Oni vespermanĝis rapide, por tuj enĉambriĝi, kaj esti preta frumatene.

Gertrude, afliktite, incitite, kaj samtempe pufigite per ĉiuj komplimentoj, tiam ekmemoris ĉion, kion ŝi suferis fare de ŝia

karceristino; kaj vidante la patron tiel dispona ŝin komplezi pri ĉio, escepte de unu afero, decidis elprofiti la aktualan favoran situacion, por kontentigi almenaŭ unu el la pasioj, kiuj ŝin turmentis. Ŝi do esprimis grandan malinklinon resti kun tiu virino, akre plendante pri ties trakto-manieroj.

«Kiel!» diris la princo: «ĉu ŝi malrespektis vin! Morgaŭ, morgaŭ mi faros al ŝi riproĉegon laŭmerite. Lasu la aferon al mi, kiu al ŝi konatigos, kiu do estas ŝi, kaj kiu estas vi mem. Ĉiel ajn, la filino, pri kiu mi kontentas, rajtas ne vidi ĉirkaŭ si malŝatatan personon». Tion dirinte, li venigis alian virinon, kaj al ŝi ordonis priservi Gertrude-n; ĉi-lastata, remaĉante kaj tragustante la akiritan riparon, tamen miris, ke ŝi trovas ĝin tiel sen-suka, kompare kun sia antaŭa dezirego. La afero, kiu plejmulte okupis ŝian tutan animon, estis la sento pri la grandaj progresoj faritaj tiutage survoje al monakiniĝo, kaj la penso ke, por retiriĝi, ŝi nun bezonos pli da energio kaj rezoluteco, ol kiom sufiĉus antaŭ nemulte da tagoj, kion tamen ŝi ne estis aŭdacinta fari.

La virino, kiu ŝin akompanis en la dormo-ĉambron, estis hejmo-veterano, iama gubernistino de l' principo, kiun ŝi ricevis apenaŭ elvindigita, kaj vartis ĝis adolesk-aĝo, kaj kiun ŝi faris objekto de siaj plezuriĝoj, siaj esperoj, sia gloro. Ŝi kontentis pri tiutaga decido, kvazaŭ pri sia propra feliĉaĵo, kaj Gertrude devis, kiel lastan amuzon, ĝuaĉi la gratulojn, la laŭdojn, la konsilojn de la oldulino, kaj aŭdi pri onkloj kaj praonkloj, estintaj tute kontentaj, ke ili fariĝis monakinoj, ĉar, kiel membroj de tia familio, ili ĉiam ĝuis unuajn honorojn, ĉiam sukcesis havi longan influon ekster la monakinejo, kaj el siaj vizitejoj sukcesis atingi aferojn, kiajn plej altrangaj damoj el siaj mondumaj salonoj ne povis atingi.

La oldulino al ŝi parolis pri la vizitoj, kiujn ŝi ricevos: ian tagon venos eĉ senjoro princido, kun la edzino, kiu nepre estos nobelega senjorino; kaj tiam ne nur la monakinejo, sed la tuta urbeto ekscitiĝos. Ŝi parolis senvestigante Gertrude-n, parolis kiam Gertrude jam estis en-lite; ŝi ankoraŭ parolis, dum Gertrude jam dormis. Junaĝo kaj laciĝo supervenkis la zorgojn. La dormo estis anhela, perturbita, plena de penaj songoj; sed ĝin rompis nur la kria voĉo de l' oldulino, veninta ŝin veki, por ke ŝi pretigu sin, por veturi al Monza.

«Ek, ek, senjorino nuptulino: jam plene tagiĝis; kaj, por tute vestiĝi kaj kombiĝi, vi bezonos almenaŭ unu horon. Senjorino princino jam sin vestas; kaj oni ŝin vekis kvar horojn antaŭ ol kutime. Senjoro princido jam desupris al la ĉevalejo, kaj resupris, kaj jam pretas ekveturi kiam ajn. Tia diableto estas vigla kiel leporo: hm! Tia li estas ek de infanaĝo; tion atesti povas mi mem, kiu portis lin surbrake. Sed kiam li estas preta, oni ne rajtas prokrastumi, ĉar, kvankam plej bon-karaktera en la mondo, tiam li senpacientiĝas kaj kriegas. La povrulo! Endas kompreni lin, ĉar tia estas lia natura temperamento; kaj ĉi-foje li iom eĉ pravus, ĉar li sin ĝenas por vi. Ve, se lin tuŝi en tiaj momentoj! Tiam li konsideras neniun, escepte senjoron princon. Sed entute li havas neniun super si, krom senjoro princo; kaj ian tagon li mem estos senjoro princo... sed kiel eble plej malfrue. Rapide, rapide, senjorino! Kial vi rigardas min tiel gape? Ĉi-hore vi jam devus esti ekster la kuŝejo».

Ĉe l' imago pri l' senpacienca princido, ĉiuj ceteraj pensoj, amasiĝintaj en la vekitan menson de Gertrude, subite disleviĝis, kiel aro da paseroj ĉe l' apero de milvo. Ŝi obeis, vestis sin rapide, sin lasis kombi, kaj ŝi aperis en la salono,

kien jam kunvenis la gepatroj kaj la frato. Oni ŝin sidigis sur brakseĝon, kaj oni ŝin regalis per taseto da ĉokolado, kio tiuepoke egalvaloris kiel ĉe la Romianoj doni la viran togon¹.

Kiam oni venis avizi, ke estas jungite, la princo apartigis la filinon, kaj al ŝi diris: «nu, Gertrude, hieraŭ vi kondukis honore: hodiaŭ vi devas eĉ superi vin mem. Temas pri solena apero en la monakinejo kaj la urbeto, kie vi estas destinita roli unuan rangon. Oni atendas vin...». Superfluas diri, ke la antaŭan tagon la princo estis sendinta avizon al la abatino. «Oni atendas vin, kaj ĉies okuloj estos super vi. Digneco kaj senĝeneco. La abatino vin demandas, kion do vi volas: estas formalaĵo. Vi povas respondi, ke vi petas akceptiĝi por surmeti monakinan robon en tiu klostro, kie vi estis edukita tiel amoplene, kie vi ricevis tiom da fajnaj komplezoj: ĝi estas pura vero. Ĉi-nemultajn vortojn diru senĝene: tiel ke oni ne diru, ke oni al vi sufloris², kaj ke vi ne kapablas paroli per vi mem. Tiuj bonaj patrinoj nenion scias pri la okazinto: ĝi estas sekreto, kiu devas resti tute kaŝita en la familio; tial vi ne faru mienon penta kaj hezita, kiu povus iel suspektigi. Montru el kia sango vi devenas: ĝentila, modesta; sed memoru, ke en tiu loko neniu, krom la familio, estos super vi».

Sen atendi respondon, la princo ekiris; Gertrude, la princino kaj la princido lin sekvis; ĉiuj desupris tra la ŝtuparo kaj enkaleŝiĝis. La implikoj kaj ĝenoj de la mondumo, kaj la beateco de la enklostra vivo, ĉefe por fraŭlinoj el plej nobela sango, estis temo de la konversacio dum la veturo. Ĉe l' fino de l' vojo, la princo renovigis la instrukciojn al la filino, kaj al ŝi plurfoje ripetis la respond-formulon. Enirante en Monza-n,

¹ *doni la viran togon* : deklari knabon plenkreskulo.

² *sufioris*: sugestis.

Gertrude eksentis kor-premon; sed ŝian atenton deturnis mi ne scias kiuj senjoroj, kiuj, haltiginte la kaleŝon, recitis mi ne scias kian komplimenton. Plu-veturante, oni venis preskaŭ hom-paŝe al la monakinejo, inter rigardoj de l' scivoluloj, ĉiuflanke amasiĝantaj surstrate. Ĉe l' halto de l' kaleŝo, antaŭ tiuj muroj, antaŭ tiu pordego, la koro de Gertrude eĉ pli multe premiĝis. Oni elkaleŝiĝis inter du homaj spaliroj, kiujn la servistoj retenis. Tio ke ĉies okuloj fiksrigardis la povrulinon, ŝin devigis daŭre afekti sian teniĝon; sed pli ol ĉiuj kune, ŝin superregis la patraj okuloj, al kiuj, kvankam ŝi timegis ilin, ŝi ne povis ne turni ĉiumomente la siajn. Kaj tiuj okuloj gvidregis ŝiajn movojn kaj mienon, kvazaŭ per nevideblaj kondukiloj. Transirinte unuan korton, oni eniris alian, kaj tie vidiĝis la pordego de la interna klostro, malfermita kaj tute okupita de monakinoj. Unuavice la abatino, ĉirkaŭite de oldulinoj; malantaŭe aliaj monakinoj senorde, kelkaj starantaj piedpinte; last-vice la servantaj monakinoj, staraj sur benketoj. Ĉi tie kaj tie vidiĝis mezalte ankaŭ okuletoj brili kaj vizaĝetoj elŝoviĝi elinter la monakinaj roboj: estis la plej lertaj kaj plej aŭdacaj inter la edukatinoj, kiuj, enŝovinte sin inter monakino kaj monakino, sukcesis estigi apertureton, por ion vidi. El tiu kunpremita hom-amaso venis aklamoj, vidiĝis multe da brak-svingoj, kiel signo de akcepto kaj ĝojo. Oni atingis la pordegon; Gertrude troviĝis vizaĝ-al-vizaĝe kun la patrino abatino. Post unuaj komplimentoj, ĉi-lastaj, kun gaj-solena maniero, ŝin demandis, kion ŝi deziras en tiu loko, kie neniu estas, kiu povus ion al ŝi rifuzi.

«Mi estas ĉi tie...», komencis Gertrude; sed, eldirante la vortojn, kiuj preskaŭ senrevoke ŝian destinon decidis, ŝi hezitis momente, kaj restis kun la okuloj fiksjaj super la

kontraŭa homamaso. Tiumomente ŝi ekvidis unu el la konataj kunulinoj, kiu ŝin rigardis kun mieno kompata kaj malica, kvazaŭ ŝi dirus: ha! enfalis en kaptilon la bravulino. Tiu ekvido, en ŝi revivigante ĉiujn iamajn sentojn, al ŝi redonis ankaŭ iom el iama kuraĝeto; kaj ŝi serĉis ajnan respondon, malsaman ol la diktita; sed, levinte la rigardon al la patra vizaĝo, kvazaŭ por provi sian forton, ŝi ekvidis en ĝi tiel sombran maltrankvilon, tiel minacan malpaciencon, ke, rezoluta pro timo, rapide kvazaŭ ŝi forkurus el terura objekto, ŝi daŭrigis: «mi estas ĉi tie, por peti monakinan robon, en tiu ĉi klostro, kie mi estis edukita tiel amoplene». La abatino tuj respondis, ke ŝi tre bedaŭras, en tia ĉi okazo, ke la reguloj al ŝi malpermesas doni tujan respondon, kiu devas veni el la komunaj balotoj de l' monakinoj, kaj antaŭ kiu bezonatas rajtigo de l' superuloj. Ke tamen Gertrude, konante la sentojn regantajn ŝiarilate en tiu loko, povas tute certe prognozi, kia estos la respondo; kaj ke intertempe nenia regulo malpermesas al la abatino kaj monakinoj esprimi sian ĝojon pro tiu peto. Tiam leviĝis konfuza bruado de gratuloj kaj aklamoj. Oni tuj alportis grandajn pletojn plenajn de dolĉaĵoj, per kiuj oni regalis unue la nuptulinon, kaj poste la parencojn. Dum iuj monakinoj konkure akaparumis ŝin, kaj aliaj gratulis la patrinon, kaj triaj la principon, la abatino petigis la princon, ke li bonvolu veni al la viziteja krado, kie ŝi lin atendas. Ŝin akompanis du multaĝaj monakinoj; kaj vidinte la princon aperi, «senjoro princo», ŝi diris: «por obei la ekleziajn regulojn... por plenumi nepran formalajaĵon, kvankam ĉi-kaze... mi tamen devas al vi diri... ke, ĉiufoje kiam filino petas ricevi monakinan robon,... la superulino, kio malinde mi estas,... havas la devon averti la gepatrojn..., ke se ili eventuale...

perfortus la volon de la filino, ili enfalus en ekskomunikon. Vi bonvolos min pardoni...».

«Bonege, bonege, respektinda patrino. Mi laŭdas vian precizemon: estas tro prave... Sed vi ne povas pridubi...».

«Ho imagu, senjoro princo!... mi parolis pro nepra devo,... cetere...».

«Certe, certe, patrino abatino».

Interŝanĝinte ĉi-nemultajn vortojn, la du interparolintoj faris al si reciprokan riverencon, kaj tuj disiĝis, kvazaŭ estus al ambaŭ penige restadi vizaĝ-al-vizaĝe; kaj ambaŭ iris rekuniĝi kun la respektiva societo, unu ekstere, la alia interne de la klostra sojlo. La princo allasis pluan tempon por iom da aliaj babiloj, kaj poste «ek», li diris: «baldaŭ Gertrude povos ĝui trankvile la kunecon de ĉi-patrinoj. Pormomente ni ĝenis ilin jam sufiĉe». Tion dirinte, li riverencis; la familio ekiris kun li; oni renovigis komplimentojn, kaj oni foriris.

Dum-revene Gertrude ne tro emis konversacii. Terurite pro la farita elpaŝo, honto-plena pro sia sentaŭgeco, kolera kontraŭ la aliaj kaj kontraŭ si mem, ŝi triste kalkulis la ankoraŭ restantajn oportunojn por nea respondo; kaj ŝi senenergie kaj konfuzo al si promesis, ke en unu, aŭ alia, aŭ tria okazo ŝi estos pli lerta kaj pli energia. Malgraŭ ĉiuj ĉi-pensoj, tute ne ĉesis ŝia teruro pri tiu severega patra mieno; tiagrade ke, kiam ŝi, kaŝrigardante, povis konstati, ke sur lia vizaĝo ne plu estas spuro de kolero, kiam ŝi eĉ vidis, ke li sin montras kontentega pri ŝi, tio ŝajnis al ŝi feliĉaĵo, kaj ŝi estis momente tute kontenta.

Alveninte hejmen, oni tuj devis denove sin vesti kaj tualeti; poste tagmanĝo, poste kelke da vizitoj, poste kaleŝ-trotado, poste konversacio, poste vespermanĝo. Ĉe ties fino, la

princo proponis alian aferon, nome elekti la nupto-patrinon. Temis pri la damo rolonta, laŭ peto de l' gepatroj, kiel gardantino kaj eskorto de l' kandidata monakino, en la tempo inter la enirpeto kaj la fakta eniro en klostron; tempo pasigata per vizitoj al preĝejoj, publikaj palacoj, konversaciejoj, vilaoj, pilgrimlokoj: entute ĉiuj vidindaĵoj de la urbo kaj de l' ĉirkaŭo, por ke la junulinoj, antaŭ ol eldiri senrevokan voton, tute vidu, kion do ili piedbatas. «Oni devos pensi pri nupto-patrimo», diris la princo: «Ĉar morgaŭ venos la vikario pri l' monakinoj, por la ekzamen-formalaĵo, kaj tuj poste Gertrude estas proponota en la kapitulo de l' patrinoj monakinoj, por ke ŝi akceptiĝu». Li diris tion turnite al la princino; kaj ĉi-lasto, opiniante ke tio estas invito proponi, ekdiris: «povus esti...». Sed la princo interrompis: «Ne, ne, senjorino princino: la nupto-patrimo devas antaŭ ĉio plaĉi al la nuptulino; kaj kvankam laŭ universala moro ja la gepatroj rajtas fari tiun elekton, tamen Gertrude havas tiom da prudento, tiom da saĝo, ke ŝi tute meritas, ke oni faru por ŝi escepton». Ĉe tio, li sin turnis al Gertrude, afektis specialan korfavoron, kaj daŭrigis: «Ĉiu el la damoj partoprenintaj ĉi-vespere en la konversacio havas la necesajn ecojn, por esti nupto-patrimo de filino el nia domo; mi opinias, ke el ili neniu estas, kiu ne taksus sin honorata, se oni elektus ŝin: vi mem elektu».

Gertrude tute komprenis, ke fari ĉi tiun elekton signifas esprimi denovan konsenton; sed la propono estis farata kun tia pompo, ke rifuzo, kiom ajn humila, ŝajnus malŝato, aŭ almenaŭ kaprico aŭ afektaĵo. Ŝi do faris ankaŭ tiun elpaŝon; kaj ŝi nomumis la damon, kiu tiu-vespere plej multe al ŝi plaĉis; tio estas: tiun, kiu al ŝi faris plej multe da karesoj, plej multe ŝin laŭdis, ŝin traktis kun la familiaraj, amemaj kaj

zorgoplenaj manieroj, kiuj en la unuaj momentoj de interkonatiĝo afektas longtempan amikecon. «Bonega elekto», diris la princo, kiu ĝuste tiun damon deziris kaj esperis. Ĉu intence, ĉu hazarde, okazis kiel kiam iluziisto montras tutan ludkartaron antaŭ viaj okuloj kaj petas ke vi pensu unu karton, kaj li mem ĝin divenos: sed fakte la kartojn li montris tiamaniere, ke vi vidu nur unu el ili. Tiu damo tiom restis la tutan vesperon ĉirkaŭ Gertrude, tiom multe ŝin okupis per si, ke Gertrude bezonus klopodon, por elekti alian. Kaj tiom da afablaĵoj ne estis sencelaj: jam delonge la damo priatentis la princidon, por igi lin bofilo: tial ŝi rigardis la aferojn de tiu familio kiel siajn; kaj do tute kompreneble ŝi zorgis pri tiu kara Gertrude ne malpli ol pri siaj plej proksimaj parencoj.

La postan matenon Gertrude vekiĝis kun la zorgo pri la ekzamenonto; kaj dum ŝi cerbumis, ĉu ŝi povas eluzi tian decidan okazon, por retropaŝi, kaj kiamaniere, la princo ŝin vokigis. «Nu, filinjo», li al ŝi diris: «ĝis nun vi kondukis eminente: hodiaŭ temos pri kronado de la tuta afero. Ĉio, kio estas farita ĝis nun, laŭ via konsento estas farita. Se dumtempe en vi naskiĝis eventuala dubo, eta pento, junaĝaj grilaĵoj,³ vi jam estus devinta klarigi; sed nun la afero atingis tian gradon, ke ne plu estas tempo por infanaĵoj. La bonvirtulo venonta ĉi-matene, al vi faros amason da demandoj super via vokiĝo: ĉu vi monakiĝas libervole, kaj kial, kaj kiel, kaj mi ne scias kio. Se vi hezitas respondi, neniu scias, kiom longe li tenos vin streĉita. Tio estus por vi tedaĵo, turmento; sed el tio povus deveni eĉ pli grava bedaŭrindaĵo. Post ĉiuj publikaj elmontroj jam faritaj, ĉiu eĉ plej eta hezito, kiu eventuale aperus en vi, endanĝerigus mian honoron kaj kredigus, ke mi taksis firma

³ *grilaĵoj*: strange frenezetaĵoj.

decido vian leĝeraĵon,⁴ ke mi tro urĝis la aferon, ke mi... kion do mi scias? Ĉi-kaze mi estus devigata elekti ĉagrenan alternativon: aŭ lasi ke la mondo havu pri mia konduto negativan opinion: alternativo tute ne kunigebla kun miaj devoj rilate min mem. Aŭ malkaŝi la veran motivon de via decido kaj...». Sed ĉe tio, vidante ke Gertrude tute ruĝiĝis, kaj ŝiaj okuloj ŝvelas, kaj la vizaĝo kuntiriĝas kiel flor-folioj en antaŭ-tempesta sufokeco, li ĉesigis tian parolon, kaj kun serena mieno li daŭrigis: «nu, nu, ĉio dependas de vi, de via prudento. Mi ja scias, ke vi havas multe da ĝi, kaj vi ne estas knabino tia, ke bonan faraĵon vi fuŝas ĉe l' fino; sed estis mia devo preventi ĉiajn kazojn. Oni pri tio ne plu parolu; kaj estu konsentite, ke vi respondos firme, tiel ke ne estiĝu duboj en la kapo de tiu bonvirtulo. Tiel ankaŭ vi mem elturniĝos pli frue». Kaj ĉe tio, sugestinte kelkan respondon al plej verŝajnaj demandoj, li ekstraktis la kutiman temon pri l' dolĉoj kaj ĝuoj preparitaj al Gertrude en la monakinejo; kaj li okupis ŝin pri tiu temo, ĝis venis la servisto anonci la alvenon de la vikario. La princo rapide renovigis la plej gravajn avertojn, kaj lasis la filinon sola kun li, kiel preskribite.

La bonvirtulo venis iom konvinkite, ke Gertrude havas grandan klostro-vokiĝon: ĉar tion al li diris la princo, kiam li iris inviti lin. Estas ja vere, ke la bona pastro, kiu konsciis, ke malfidemo estas unu el la plej necesaj ecoj en lia ofico, havis kiel principon, ne tuj kredi tiajn deklaregojn, kaj gardi sin kontraŭ antaŭjuĝoj; sed tute malofte okazas, ke asertaj kaj certaj vortoj de ĉiuspeca aŭtoritatulo ne influas la menson de aŭskultanto.

Post la unuaj komplimentoj, «fraŭlino», li al ŝi diris, «mi

⁴ *leĝeraĵon*: malseriozaĵon.

venas roli kiel diablo; mi venas pridubi tion, kion vi jam certigis en via peticio; mi venas prezenti al vi la malfacilojn, kaj konstati, ĉu vi tute konsideris ilin. Komplezu do, ke mi faru al vi kelke da demandoj».

«Vi diru laŭplaĉe», respondis Gertrude.

Tiam la bona pastro komencis pridemandi ŝin, laŭ la formo preskribita de la reguloj: «Ĉu vi sentas en via koro liberan, spontan rezolutecon fariĝi monakino? Ĉu oni ne uzis minacojn aŭ flatojn? Ĉu oni ne aplikis ajnan aŭtoritatecon, por decidigi vin al tio? Vi parolu libere kaj sincere, al homo, kies devo estas ekkoni vian veran intencon, por tute malebligi, ke oni al vi faru perforton».

La vera respondo al tia demando tuj prezentiĝis al la menso de Gertrude, kun terura evidenteco. Sed, por doni tian respondon, necesus doni klarigon, diri kial ŝi estis minacita, rakonti tutan historieton... La malfeliĉa terurite forfuĝis de tiu penso; ŝi elserĉis rapide alian respondon; ŝi trovis nur unu, kiu tuj kaj sekure ŝin liberigos el tia turmento: nome la plej malveran: «Mi fariĝas monakino», ŝi diris, kaŝante sian eksciton, «mi fariĝas monakino spontane, libervole».

«Ek de kiam estiĝis en vi ĉi tiu intenco?» demandis ankoraŭ la bona pastro.

«Ĉiam mi havis ĝin», respondis Gertrude, fariĝinte, post tiu unua paŝo, pli aplomba en mensogado kontraŭ si mem.

«Sed kiu estas la ĉefmotivo, kiu vin instigas fariĝi monakino?».

La bonvirta pastro tute ne sciis, kian teruran klavon li tuŝas; kaj Gertrude faris egan klopodon, por ne montri survizaĝe la efekton, kiun tiuj vortoj estigis sur ŝia animo. «La motivo», ŝi diris, «estas: servi al Dio kaj eviti la mondumajn

danĝerojn».

«Ĉu ne ĉeestas ia ĉagreno? Ĉu ia... pardonu... kaprico? Foje momenta motivo povas tiel impresi, ke ĝi aspektas kiel ĉiam-daŭra; sed poste, kiam la motivo ĉesas, kaj la sento ŝanĝiĝas, tiam...».

«Ne, ne», respondis impete Gertrude: «la motivo estas tiu, kiun mi al vi diris».

La vikario insistis per demandoj, pli por tute plenumi sian devon, ol pro konvinko ke ŝi tion bezonas; sed Gertrude estis rezoluta trompi lin. Krom la abomeno, kiun ŝi sentis ĉe l' penso konsciigi pri ŝia faleto tiun gravan kaj bonvirtan pastron, kiu ŝajnis tiel fora de tia suspekto pri ŝi; la kompatinda pensis ankaŭ, ke li ja povas malpermesi ŝian monakiniĝon; sed tie ĉesas lia aŭtoritato super ŝi, kaj lia protekto. Post lia foriro, ŝi restos sola kun la princo. Kaj kion ajn ŝi devos pli poste en tiu domo suferi, la bona pastro tute ne ekscios, aŭ, eĉ sciante, malgraŭ ĉia bona intenco tute nenion li povos, krom kompati ŝin, per tia trankvila kaj modera kompatato, kiun oni ĝenerale kompleze donas, kvazaŭ pro ĝentileco, al la suferanto, kiu mem estis kaŭzo aŭ preteksto de sia sufero. La ekzamenanto laciĝis demandadi, antaŭ ol la malfeliĉa laciĝus mensogi: kaj aŭdante tiujn respondojn daŭre konformaj, kaj havante nenian kialon por dubi pri ilia sincereco, fine li ŝanĝis parolmanieron; li gratulis al ŝi; li iel pardonpetis, ke li tiom prokrastis tiun ĉi devon; li aldonis tion kion li taksis plej taŭga, por ŝin firmigi en ŝia bona intenco; kaj li forsalutis.

Trairante la salonojn, por eliri, li renkontis la princon, kiu ŝajnis tie pasi hazarde; kaj li gratulis ankaŭ al li pro la bonaj dispozicioj trovitaj en lia filino. Ĝis tiam la princo estis en plej

zorga suspenso; ĉe tiu sciigo li ekspiris, kaj forgesante sian kutiman dignecon, li preskaŭ kuris al Gertrude, li ŝin plenigis per laŭdoj, per karesoj kaj promesoj, kun elkora jubilo, kun tenereco grand-parte sincera: tia ĉi estas la tohuvabohuo de l' homa koro!

Ni ne akompanos Gertrude-n en tiu daŭra sinsekvo de spektakloj kaj amuzoj; nek priskribos detale kaj orde la sentojn de ŝia animo dum tiu tuta tempo: estus historio de ĉagrenoj kaj hezitoj, tro monotona kaj tro simila al tio kion ni jam diris. La ĉarmo de la lokoj, la varieco de la objektoj, la amuzo, kiun ŝi ja ĝuis diskurante liber-aere, eĉ pli multe abomenigis la penson pri la loko, kien oni ŝin alkaleŝigos lastafoje, por ĉiam. Eĉ pli multe ŝin agacis la impresoj, kiujn ŝi ricevis en la konversacioj kaj festoj. La vido de l' nuptulinoj nomataj per tiu titolo en ties pli strikta kaj kutima senco, en ŝi kaŭzis ne-tolereblan envion kaj anim-ronĝon; kaj foje la aspekto de aliulo⁵ donis al ŝi la impreson, ke ricevi tiun titolon estas kulmino de ĉia feliĉo. Foje la pompo de l' palacoj, la brilo de l' dekoracioj, la svarmado kaj jubila bruado de l' festoj komunikis al ŝi tian ebriecon kaj ardon vivi gajĝoje, ke ŝi al si promesis ĉion malkonfirmi, kaj ĉion ajn suferi, prefere ol reveni al la malvarma kaj senviva ombro de l' klostro. Sed ĉiaj rezolutaj decidoj disvaporigis ĉe pli kvietaj konsideroj pri la malfaciloj, ĉe l' nura rigardo al la vizaĝo de l' princo. Foje la penso, ke ŝi devos definitive forlasi tiujn plezurojn, igis al ŝi des pli maldolĉa ties etan gustumon; samkiel soifanta malsanulo rigardas kolere kaj preskaŭ repuŝas kun spito la kuleron da akvo, kiun la kuracisto al li apenaŭ konsentas. Intertempe la vikario pri l' monakinoj jam liveris la necesan

⁵ *aliulo*: juna fianĉo aŭ edzo.

atestilon; kaj estis rajtigita la monakinara kapitulo por voĉdoni la akcepton de Gertrude. La kapitulo kunsidis; oni atingis, kiel atendite, du trionojn de la sekretaj balotoj, kiel postulis la regularo; kaj Gertrude estis do akceptita. Ŝi mem, laca pri tiu longa turmento, petis eniri la monakinejon kiel eble plej baldaŭ. Tute neniu emis tian malpaciencon bremsi. Plenumiĝis do ŝia volo; kaj ŝi, pompe kondukite al la klostro, surmetis la monakinan robon. Post dekdu-monata novicado, plena de pentoj kaj malpentoj, ŝi atingis la momenton de la voto, tio estas la momenton en kiu ŝi devus aŭ diri neon pli strangan, pli neatenditan, pli skandalan ol iam ajn, aŭ ripeti jeson jam plurfoje diritan; ŝi ĝin ripetis, kaj fariĝis por-ĉiama monakino.

Al la propraj kaj ne-komunikeblaj ecoj de la kristana religio apartenas tio, ke ĝi povas gvidi kaj konsoli ĉiun ajn, kiu ĉe ajna situacio, ĉe ajna rezultato rifuĝas al ĝi. Se pri l' pasinto eblas rimedo, la kristana religio ĝin preskribas, ĝin havigas, donas lumon kaj energion por ĝin plenumi; se ne estas rimedo, la religio vere kaj reale ebligas, kiel diras proverbo, el neceso fari virton. Ĝi instruas daŭrigi prudente tion kion oni entreprenis senpripense; ĝi disponigas la animon akcepti volonte tion, kio estis trudita perforte, kaj donas al elekto, siatempe temerara, sed nun senrevoka, la tutan sanktecon, tutan saĝecon, kaj – ni diru ĝin libere – ĉiujn ĝojojn de vera vokiĝo. Ĝi estas vojo tia ke, el ĉia labirinto⁶, el ĉia abismo ajne atingita, oni povas tra ĝi marŝi sekure kaj volonte, kaj ĝojplene atingi feliĉan finon. Tial Gertrude povus esti sankta kaj kontenta monakino, sendepende de la maniero laŭ kiu ŝi fariĝis tio. Sed la malfeliĉa baraktis sub la jugo, kaj tial ŝi des pli forte sentis ties pezon kaj skuadon. Senĉesa

⁶ *labirinto*: implikita, senelira vojo.

bedaŭro de la perdita libero, abomenado de la nuna stato, pena vagado strebe al neniam plenumotaj deziroj: tiaj estis la ĉefaj okupoj de ŝia animo. Ŝi remaĉis tiun amaran paseon, rekunmetis en sia memoro ĉiujn cirkonstancojn, kiuj ŝin kondukis tien; kaj milfoje ŝi malfaris per la penso tion, kion ŝi estis farinta per la ago; ŝi kulpigis sin pri sentaŭgeco; aliajn pri tiraneco kaj perfido; kaj ŝi rongis sian koron. Ŝi adoregis kaj samtempe bedaŭregis sian belecon, sian junecon destinitan konsumiĝi per lanta martiriĝo, kaj foje ŝi enviis ĉian virinon, en ĉia vivo-stato, kun ĉia konscienco, povantan en la mondo plenĝui tiujn bonaĵojn.

La vido de la monakinoj kunlaborintaj por enlogi ŝin tien, estis al ŝi abomena. Ŝi memoris pri la artifiko kaj ruzoj de ili uzitaj, kaj ŝi repagaĉis per multe da malafablaĵoj, da spitaĵoj, kaj eĉ per malkaŝaj riproĉoj. Al ili plej ofte konvenis glutaĉi silente, ĉar la princo ja tiranumis la filinon, kiom necese por ŝin peli en la klostron; sed, atinginte tiun celon, li ne facile tolerus, ke aliaj aŭdacus trudumi kontraŭ lia sango; kaj ĉia farita brueto povus kaŭzi la pardonon de tia granda protekto, aŭ eĉ igi la protektanton malamiko. Verŝajne Gertrude devus iel inklini por la aliaj monakinoj, ne partoprenintaj en la intrigoj: kiuj, kvankam ne dezirinte ŝin kunulino, tamen amis ŝin tia; kaj, piaj, laboremaj kaj gajaj, al ŝi montris per sia ekzemplo, ke eblas, eĉ interne de tiu loko, ne nur vivi, sed bonstati. Sed eĉ tiuj estis al ŝi abomenaj, pro alia kialo. Ilia pia kaj kontenta sinteno estis al ŝi kvazaŭ riproĉo pri ŝia malkvieto kaj moroza konduto; kaj nenian okazon ŝi neglektis, por ilin primoki ĉe-dorse kiel mispiajn, aŭ ilin mordi kiel hipokritajn. Eble ŝi estus al ili ne tiel malamika, se ŝi sciis aŭ divenus, ke ĝuste ili enmetis la malmultajn nigrajn balotilojn, trovitajn en la

balotuĵo decidinta ŝian akcepton.

Ŝajnis al ŝi ke kelke da konsoloj ŝi ricevas, pro tio ke ŝi komandas, estas flatata en la monakinejo, ricevas komplimentajn vizitojn de ekstere, kontentigas puntiliojn, disdonas sian protekton, estas vokata senjorino; sed kiaj konsoloj! La koro, tiel malmulte kontentigite, foje volus aldoni kaj ĝui samtempe la konsolojn de la religio. Sed ĉi-lastajn oni atingas nur rezignante la aliajn: kiel ŝip-pereulo, se li volas kapti la tabulon, kiu povas lin sav-konduki al la bordo, ja devas malpugnigi la manon kaj lasi la algojn ekkaptitajn pro instinkta rabio.

Nemulte post la votoj, Gertrude fariĝis majstrino de la edukatinoj; nu imagu kiel statis tiuj knabinoj sub tia disciplino. Ĉiuj iamaj konfidenculinoj jam forlasis la monakinejon; sed ŝi konservis vivaj ĉiujn tiamajn pasiojn; kaj iel ajn la lernantinoj devis porti ties pezon. Kiam ŝi pensis, ke multaj el ili estas destinitaj ĝui tiun mondumon, de kiu ŝi estas por ĉiam ekskluzivita, ŝi sentis kontraŭ tiuj povrulinoj rankoron, kvazaŭ vengemon; kaj ŝi ilin subigis, mistraktis, al ili anticipe elpagigis la plezurojn ĝuotajn pli poste. Se aŭdi, en tiaj momentoj, kun kia majstreska indigno ŝi riproĉegas ilin pro ajna bagatela bubaĵo, oni ŝin taksus virino kun kruda kaj maldiskreta pieco. Alifoje tiu sama abomeno kontraŭ la klostro, la regularo, la obeemo, eksplodis per atakoj de tute mala humoro. Tiam ŝi ne nur toleris la bruan ekscitecon de siaj lernantinoj, sed eĉ instigis ĝin; ŝi enmiksiĝis en iliajn ludojn, kaj igis ilin pli ekscesaj; ŝi partoprenis en iliaj babiloj, kaj ilin puŝis trans la intencojn kun kiuj ili estis komencitaj. Se iu diris aludan vorton pri la babilmaniero de la patrino abatino, la majstrino ŝin imitadis longe, kaj faris el tio komediaĵon; ŝi

imitaĉis la mienon de unu monakino, la marŝo-manieron de alia: tiam ŝi ridegis bruaĉe; sed tiaj ridoj ne ŝin lasis pli gaja ol antaŭe. Tiel ŝi vivis dum kelke da jaroj, havante nek oportunon nek okazon por fari pli multe; kiam malfeliĉe tia okazo prezentiĝis.

Inter ceteraj distingoj kaj privilegioj al ŝi konsentitaj, kompanse de tio, ke ŝi ankoraŭ ne rajtis esti abatino, estis ankaŭ jeno, ke ŝi loĝis en speciala apartamento. Tiu flanko de la monakinejo apudis al domo loĝata de juna viro, profesia fiulo, unu el la multaj, kiuj tiuepoke per siaj fi-armitoj kaj alianco kun aliaj fiuloj povis iugrade primoki polican forton kaj leĝojn. Nia manuskripto nomas lin Egidio, ne menciante lian familion. Li, el sia fenestreto super la eta korto de tiu speciala apartamento, vidinte kelkfoje Gertrude-n tie trapasi aŭ promeneti nenifare, logite pli ol terurite de la danĝero kaj malpieco de la elpaŝo, aŭdacis alparoli ŝin. La malfeliĉega respondis.⁷

En tiuj unuaj momentoj ŝi sentis kontenton certe ne puran, sed vivan. En la tedan malplenon de ŝia animo enmetiĝis forta, kontinua okupo, kaj mi aŭdacus diri, energia vivo; sed tiu kontento similis al la refortiga drinkaĵo, per kiu la rafinita kruelo de l' antikvuloj trinkigis kondamniton, por al li havigi forton elteni la turmentojn. Samtempe aperis rimarkindaj novaĵoj en ŝia tuta konduto: subite ŝi fariĝis pli regula, pli trankvila, ŝi forlasis mokaĉojn kaj grumbladon, ŝi eĉ montris sin karesema kaj afableca, tiel ke la monakinoj reciproke gratulis pro la feliĉa ŝanĝo; tiom multe ili foris de la imago pri la vera motivo, kaj de la kompreno, ke tia nova virteco nenio

⁷ Tiamaj reguloj tute malpermesis al monakinoj konversacii kun fremdaj viroj sen speciala rajtigo.

estas krom hipokriteco aldonata al la malnovaj fiaĵoj. Tamen tiu ŝajnigo, tiu tieldire ekstera farbigo, ne longe daŭris, almenaŭ ne tiel kontinue kaj regule: baldaŭ reaperis la kutimaj spitaĵoj kaj kapricoj, re-aŭdiĝis la malbenoj kaj mokaĉoj kontraŭ la klostra karcereco, foje per esprimmanieroj nekutimaj en tiu loko, eĉ sur tiu buŝo. Tamen post ĉiu el tiuj ekscesoj sekvis pento, granda klopodo ilin forgesigi per kaĵoloj⁸ kaj belaj vortoj. La monakinoj toleris laŭpove ĉi tiujn alternojn, kaj atribuis ilin al la moroza kaj facilanima karaktero de la senjorino.

Dum kelke da tempo ŝajnis, ke neniu supozas pli multe; sed iun tagon, kiam la senjorino, kverelante kun servanta monakino pro mi ne scias kia klaĉo, sin allasis al ekscesaj kaj senĉesaj mistraktoj, la servantino, longe elteninte, kaj la lipojn al si mordinte, fine ŝi elĉerpis la paciencon, kaj ellasis aludan vorton: ke ŝi scias ion, kaj ke siatempe kaj sialoke ŝi parolos. Ek de tiu momento la senjorino ne plu havis pacon. Sed ne pasis multe da tempo, kaj iumatene oni la servantan monakinon vane atendis por ŝiaj kutimaj taskoj: oni iras esplori en ŝia ĉelo, kaj ŝi ne troviĝas; oni ŝin vokas laŭtvoĉe; ŝi ne respondas; oni serĉas ĉi tie kaj tie; oni iras kaj reiras de supre ĝis suben: neniloke ŝi estas. Kaj neniu scias, kiom da konjektoj oni farus, se ĝuste ĉe la esploro oni ne malkovrus truon en la legomĝardena muro; afero, kiu ĉiujn supozigis, ke tra tie ŝi eskapis. Oni faris grandajn traserĉojn en Monza kaj ĉirkaŭe, kaj ĉefe en Meda, naskiĝloko de la monakino; oni skribis al diversaj lokoj: oni neniam ricevis eĉ minimuman sciigon. Eble oni pri ŝi eksciis pli multe se, anstataŭ esplori

⁸ *kaĵoloj*: karesaj flataĵoj.

malproksime, oni fokus apude⁹. Post multe da miroj (ĉar neniu taksis tiun monakinon kapabla fari tiaĵon), kaj multe da babiloj, oni konkludis ke kredeble ŝi iris foren, tre foren. Kaj ĉar ia monakino elbuŝigis: «ŝi certe rifuĝis en Nederlando», oni tuj diris, kaj longe kredis, en la monakinejo kaj ekstere, ke ŝi rifuĝis en Nederlando. Ne ŝajnas tamen ke la senjorino samopiniis. Verdire ŝi sian malkredon tute ne esprimis, kaj la komunan opinion ŝi ne kontraŭdiris per siaj propraj rezonoj; kaj, se da ili ŝi havis, tute neniam iam estis pli lerte kaŝitaj; kaj neniam alian aferon ŝi pli volonte evitis, ol tuŝi tiun historion, neniam aferon ŝi pli multe neglektis, ol esplori la abismon de tiu mistero. Sed ju malpli ŝi preparolis ĝin, des pli multe ŝi ĝin pripensis. Kiomfoje ĉiutage la bildo de tiu virino enstrudiĝis subite en ŝian menson, kaj tie starigis sin, kaj ne volis de tie moviĝi! Kiomfoje ŝi preferus vidi ŝin viva kaj reala antaŭ si, ol daŭre havi ŝin fiksa en la penso, ol devi restadi tage kaj nokte akompane kun tiu formo vana, terura kaj senpasia! Kiomfoje ŝi deziris efektive aŭdi la voĉon de tiu virino, kion ajn ŝi minacus, prefere ol senĉese havi interne de la mensa orelo la fantomecan flustradon de tiu sama voĉo, kaj aŭdi ties vortojn ripetataj kun tia obstino, kun tia senlaca insistado, kiajn vivanta homo neniam havis!

Jam pasis ĉirkaŭ unu jaro post tiu evento, kiam Lucia estis prezentita al la senjorino, kaj havis kun ŝi la interparolon, ĉe kiu ni haltigis nian ĉefrakonton. La senjorino multobligis demandojn pri la persekutado de Don Rodrigo, tuŝante certajn detalojn kun maltrankvilita, ke ĝi nepre ŝajnis stranga al Lucia, kiu neniam supozis, ke monakina scivolo povus temi pri tiaĵoj. Kaj la konsideroj, kiujn ŝi miksis kun la demandoj aŭ

⁹ *apude*: la monakino, murdite de Egidio, estis subterigita en ties kelo.

subkomprenigis, estis ne malpli strangaj. Ŝajnis, kvazaŭ ŝi primokus la konstantan abomenon de Lucia por tiu senjoro, kaj ŝi demandis, ĉu li estas monstro, por tian teruron estigi: ŝajnis, kvazaŭ ŝi trovus senprava kaj stulta la malinklinon de la junulino, se ĝin ne pravigus ŝia prefero por Renzo. Kaj ankaŭ super ĉi-lasta ŝi aŭdacis demandojn, kiuj mirigis kaj ruĝigis la demandatinon. Pli poste la senjorino, konsciinte ke tro multe ŝi lasis la langon sekvi la eskapojn de la cerbo, klopodis korekti kaj doni pli bonan interpreton al siaj babiloj; sed ŝi ne povis eviti, ke en Lucia restis malagrabra miro, kvazaŭ konfuza teruro. Kaj tuj kiam ŝi povis resti sola kun la patrino, ŝi konfidis tion al ŝi; sed Agnese, kiel pli sperta, per nemulte da vortoj solvis ĉiujn dubojn kaj klarigis la tutan misteron. «Ne miru», ŝi diris: «kiam vi konos la mondon tiom multe kiel mi, vi vidos, ke tiuj ne estas aferoj por miri. Ĉiuj senjoroj, unu- aŭ ali-flanke, estas pli-malpli frenezetaĵoj. Konvenas ilin lasi diri, ĉefe kiam oni bezonas ilin; ŝajni aŭskulti ilin serioze, kvazaŭ ili dirus prudentaĵojn. Ĉu vi aŭdis kiel ŝi riproĉegis min, kvazaŭ mi estus dirinta grandan fuŝaĵon? Mi tute ne zorgis pri tio. Tiaj estas ĉiuj senjoroj. Kaj malgraŭ ĉio, estu danko al la Ĉielo, ke ŝajnas ke ĉi-senjorino ekfavoris al vi, kaj vere intencas protekti nin. Cetere, filinjo mia, se vi pluvivos kaj vi ankoraŭ devos rilati kun senjoroj, da tiaĵoj vi aŭdos, vi aŭdos, vi aŭdos».

La deziro fari komplezon al la patro-gardanto, la plezuro protekti, la penso pri la reputacio, kiun tiel bonvirta protekto povus estigi, ia inklino al Lucia, kaj eĉ ia konsoliĝo el bonfaro al senkulpulino, el helpo kaj konsolo al prematoj, ĉio tio vere inklinigis la senjorinon zorgi pri la sorto de la du povraj rifuĝintaĵoj. Laŭ ŝia peto, kaj konsidere al ŝi, ili estis loĝigitaj en

la farmistina apartamento, kuntuŝa kun la klostro, kaj traktataj kvazaŭ destinitaj por servo al la monakinejo. Patrino kaj filino reciproke gratulis, ke tiel baldaŭ ili trovis sekuran kaj honoran rifuĝejon. Ili ŝatus ankaŭ resti tie ignorede de ĉiuj; sed la afero ne estis facila en monakinejo: des pli ke estis ie viro, kiu tro zorgis akiri sciigojn pri unu el ili, kaj en kies animo, al la antaŭaj pasio kaj puntilio, aldoniĝis la kolero, pro tio ke oni lin anticipis kaj seniluziigis. Kaj ni, lasante la virinojn en ilia rifuĝejo, revenos al lia palaco, en la horo kiam li atendadis la rezultaton de la krima ekspedicio.

XI

Kiel aro da ĉashundoj, persekutinte sensukcese leporon, revenas malfiere al la mastro, kun mallevitaj muzeloj kaj pendaj vostoj, tiel en tiu konfuzaĉa nokto revenis la bravuloj al la domo de Don Rodrigo. Ĉi-lasto en mallumo paŝadis tien kaj reen tra ne-loĝata ĉambraĉo last-etaĝa, rigardanta al la suba esplanado. De temp' al tempo li haltis, streĉis orelon, rigardis tra l' fendoj de vermo-boritaj ŝutroj, tute malpacience, kaj ne sen zorgo, ne nur pro l' malcerteco de l' sukceso, sed ankaŭ pro la eblaj konsekvencoj; ĉar temis pri la plej grava kaj riska el la fi-faroj entreprenitaj de la brava viro. Li tamen trankviligis sin, konsiderante la rimedojn aplikitajn por malaperigi indicojn se ne suspektojn. – koncerne suspektojn, – li pensis, – mi primokas. Mi scivolus, kia volontulo aŭdacus veni ĉi supren, por vidi, ĉu ĉeestas aŭ ne ĉeestas knabino. Ja venu tiu sentaŭgulo¹, kaj li estas inde akceptota! Ja venu la frataĉo, venu! Kio pri la oldulino? Iru al Bergamo la oldulino! Kio pri la justico? Ba, la justico! La komunumestro estas nek knabo, nek frenezulo. Kaj kio en Milano? Kiu zorgas pri ĉi-homoj en Milano? Kiu do aŭskultus ilin? Kiu eĉ scias, ke ili ekzistas? Ili estas kvazaŭ perdiĝintoj surtere; ili havas eĉ ne mastron: nenies homoj! Nu, nu, nenia timo! Kiel impresiĝos Attilio morgaŭ matene! Li vidos, li vidos, ĉu mi faras babilojn aŭ faktojn. Kaj krome... se estiĝus eventuala impliko..., kion mi scias? ia malamiko volus eluzi tiun ĉi okazon..., ankaŭ Attilio scipovus min konsili: kun ĉi-afero estas ligita la honoro de la tuta parenkaro. – Sed la penso, ĉe kiu li haltis plilonge, ĉar en ĝi li trovis samtempe kvietigon de l' duboj kaj nutron de l' ĉef-pasio, temis pri la uzotaj logaĵoj kaj promesoj, por

¹ *sentaŭgulo*: aludo al Renzo.

inklinigi Lucia-n. – Ŝi tiel multe timegos, troviĝante ĉi tie sola, meze de tiaj ulaĉoj, de tiaj mienoj, ke, diable... la plej humana vizaĝo ĉi tie ja estas mi mem, diable... ke ŝi devos sin turni al mi, ŝi estos devigita petegi; kaj se ŝi petegas... –

Dum li faras ĉi-belajn konjektojn, li aŭdas paŝo-bruon, li iras al la fenestro, ĝin malfermetas, elŝovas la kapon; ja estas ili mem. – Kaj kio pri l' porto-seĝo? Diable! kie estas la porto-seĝo? Tri, kvin, ok: ĉiuj ĉeestas; ĉeestas ankaŭ la Grizulo; sed la portilo ne estas: diable! diable! la Grizulo donos al mi praviĝon. –

Post ilia eniro, la Grizulo demetis en angulon de ter-etaĝa ĉambro la pilgrim-bastonon, demetis la ĉapelaĉon kaj la pilgrim-mantelon, kaj, kiel postulis lia rango, tiumomente de neniu enviata, li alsupris por fari raporton al Don Rodrigo. Ĉi-lasto lin atendis kulmine de la ŝtuparo, kaj vidinte lin aperi kun la plumpa aspektaĉo de seniluziigita fripono, «nu,» li al tiu diris, aŭ kriis: «sinjoro fanfarono, sinjoro kapitano, sinjoro *aferon-lasu-al-mi?*».

«Estas ja peze,» respondis la Grizulo, restante kun unu piedo sur la unua ŝtupo, «estas ja peze ricevi riproĉojn, post kiam oni laboris fidele, klopodis fari sian devon, kaj eĉ riskis la vivaĉon».

«Kiel okazis? Mi aŭdos, mi aŭdos,» diris Don Rodrigo, kaj li ekiris al sia ĉambro, kien la Grizulo lin sekvis kaj tuj raportis pri tio, kion li dispoziciis, faris, vidis kaj ne vidis, aŭdis, timis, rimedis; kaj la raporton li faris kun la ordo kaj konfuzo, la malcerteco kaj konsterno, kiaj nepre regis en liaj ideoj.

«Vi ne malpravas, kaj bone kondukis,» diris Don Rodrigo: «vi faris kiom eblis; sed... sed, ĉu eble ĉeestas ia spiono sub

tiu ĉi tegmento! Se iu tia ĉeestas, se mi sukcesas lin malkovri, kaj ni ja malkovros lin, se li ĉeestas, mi mem lin draŝos; mi ja povas certigi vin, Grizulo, ke mi lin regalos per solena batado».

«Tia suspekto, sinjoro,» diris la Grizulo, «trapasis ankaŭ mian menson: kaj se tio estus vero, se ĉi tian kanajlon oni sukcesus malkovri, la sinjoro mastro devus lasi lin al miaj manoj. Homon, kiu amuziĝis, pasigante al mi tian ĉi noktaĉon! Lin rekompenci apartenus al mi. Tamen, el diversaj aferoj al mi tute verŝajnas, ke subestas alia intrigo, ĝis nun ne komprenebla. Morgaŭ, sinjoro, morgaŭ la afero klariĝos».

«Ĉu almenaŭ oni ne rekonis vin?».

La Grizulo respondis, ke espereble ne. Fine de la interparolo, Don Rodrigo al li ordonis por morgaŭ tri aferojn, kiujn eĉ li mem kapablus elpensi. Unue, sendi fru-matene du virojn, por doni al la vilaĝestro la ordonegon, kiu fakte al li estis donita, kiel ni vidis; due, sendi du aliajn al la izola domaĉo, por patroli, kaj forteni ĉian ulaĉon, kiu tien trafus, kaj teni la porto-seĝon for de ĉia rigardo ĝis la venonta nokto, kiam oni sendos forporti ĝin; ĉar dume konvenis ne fari aliajn suspektindajn movojn; trie: la Grizulo mem, kaj ankaŭ aliaj bravuloj el plej senĝenaj kaj saĝkapaj, iru enmiksiĝi en la popolon, por ion malkovri koncerne la implikon de tiu nokto. Tion ordoninte, Don Rodrigo foriris dormi, kaj tion li permesis ankaŭ al la Grizulo, forsolutante lin kun multe da laŭdoj, el kiuj evidentiĝis la intenco kompensi la impetajn insultojn, per kiuj li akceptis lin.

Iru dormi, povra Grizulo, ĉar vi certe tion bezonas. Povra Grizulo! En klopodoj tutan tagon, en klopodoj duonan nokton, krom la danĝero fali sub l' ungegojn de l' kampuloj, aŭ fariĝi

objekto de kapto-premio *pro rabo de honesta virino*, aldone al la ceteraj kapto-prezroj jam ŝvebantaj super via kapo; kaj poste ricevi tian akcepton! Ba! ofte homoj tiele rekompencas. Tamen ĉi-kaze vi povis konstati ke justeco, kvankam ne tuja, tamen alvenas frue-malfrue, eĉ en tiu ĉi mondo. Pormomente vi iru dormi: ĉar iam vi eble povos doni pri tio alian pruvon, eĉ pli rimarkindan² ol ĉi tiu.

La postan matenon la Grizulo jam estis ekstere, en klopodoj, kiam Don Rodrigo ellitiĝis. Li tuj serĉis grafon Attilio, kiu, vidante lin aperi, afektis mokajn mienon kaj geston, kaj al li kriis: «Sankta Marteno!».

«Mi ne scias, kion diri», respondis Don Rodrigo, atingante lin: «mi pagos la veton; sed ne tio estas mia ĉefĉagreno. Mi nenion al vi diris anticipe, ĉar, mi konfesas, mi esperis fari al vi surprizegon ĉi-matene. Sed... sufiĉe, nun mi rakontos al vi ĉion».

«En la aferon enŝovis la nazon tiu frataĉo», diris la kuzo, aŭskultinte lin pli serioze ol atendeble el tiel bizara cerbo. «Tiu frataĉo», li daŭrigis, «per sia afekta naiveco, per siaj sensukaj sentencoj..., mi taksas lin ruzegulo kaj sintrudulo. Kaj vi ne fidis min, vi ne tute al mi klarigis, por kia implikaĉo li venis ĉi tien antaŭhieraŭ». Don Rodrigo raportis la interparolon. «Kaj ĉu vi havis tian paciencigon?» elkriis grafo Attilio: «kaj vi lasis lin foriri tia, kia li alvenis?».

«Ĉu vi volas, ke mi instigu kontraŭ min ĉiujn kapucenojn de Italujo?».

«Mi ne scias,» diris grafo Attilio, «ĉu en tia momento mi memorus, ke en la mondo estas aliaj kapucenoj krom tiu

² *pruvon... eĉ pli rimarkindan*: ironiaĵo: la Grizulo perfidos Don Rodrigon (ĉ. XXXIII).

temerara fripono; sed ek! ĉu malgraŭ la reguloj de prudento mankas la maniero repagi eĉ kapucenon? Necesas siatempe duobligi ĝentilaĵojn al la tuta korpo, kaj tiam oni povas senpune doni amason da baston-batoj al unu membro. Sufiĉe; li evitis tute merititan punon; sed nun mi prenas lin sub mian protekton; kaj mi volas ĝui la plezuron instrui lin, kiel paroli al nia-ranguloj».

«Ne pli aĉigu la aferon».

«Fidu min iam ajn, kaj mi servos vin kiel parenco kaj amiko».

«Kion vi intencas fari?».

«Mi ankoraŭ ne scias; sed la frataĉon mi aranĝos tutcerte. Mi pripensos, kaj... senjoro grafo onklo, el la Sekreta Konsilio, li mem devos fari al mi tiun servon. Kara senjoro grafo onklo! Kiom mi plezuriĝas, kiam mi povas tia-rangan politikiston klopodigi por mi! Postmorgaŭ mi estos en Milano, kaj iamaniere la frataĉo estos aranĝita.

Dume venis la matenmanĝo, kiu ne interrompis la pritrakton de afero tiel grava. Grafo Attilio pri ĝi parolis senĝene, kaj malgraŭ lia kunsento kun la kuzo, kiel postulis la amikeco kaj la honoro de la parenceco, laŭ lia koncepto pri amikeco kaj honoro, li tamen de temp' al tempo ne bremsis subridon pri tia rezultato. Sed pli gravaj pasioj ekscitis kaj pli ĝenaj pensoj absorbis Don Rodrigon, kiu estis persone koncernata kaj konjektis plenumi senĝene grandan mirindaĵon, sed estis frakase fiaskinta. «Ja belajn klaĉojn», li diris, «faros ĉi-aĉuloj en la tuta ĉirkaŭaĵo. Sed kio al mi gravas? Koncerne justicon, mi priridas: da pruvoj ne estas; kaj eĉ se estus, mi same priridas. Ĉiuokaze ĉi-matene mi avertigis la vilaĝestron, ke li tute evitu raportoj pri l' okazintaĵo. Nenio sekvas; tamen

eĉ la klaĉoj, se tro longaj, min ĝenaĉas. Eĉ troas, ke mi estas mokita tiel barbare».

«Bonege vi faris», respondis grafo Attilio. «Tiu via komunumestro... ege obstina, ege ventkapa, granda ĝenulo tiu komunumestro... tamen li estas honestulo, devo-konscia; kaj ĝuste kiam oni devas rilati kun tiaj, oni devas plej zorge eviti ilin embarasi. Se aĉega vilaĝestro faras raporton, la komunumestro, eĉ se tute bonvola, ja devas...».

«Sed vi», interrompis kolerete Don Rodrigo, «vi fuŝas miajn aferojn, per via kontraŭdirado pri ĉio, kaj via riproĉkriado, kaj eĉ mokado ĉe-okaze. Ĉu komunumestro, diable, ne rajtas kondukti bestaĉe kaj obstine, se cetere li estas honestulo?».

«Ĉu vi scias, kuzo», diris grafo Attilio, rigardante lin mirigite, «ĉu vi scias, ke mi komencas opinii, ke iomete vi timas? Vi serioze konsideras eĉ la komunumestron...».

«Nu, nu, ĉu ne vi mem diris, ke necesas lin konsideri?».

«Mi ĝin diris: kaj kiam temas pri seriozaĵo, mi pruvos al vi, ke mi ne estas infano. Ĉu vi scias, kion mi aŭdacus fari por vi? Mi estas tia, ke mi mem faros viziton al sinjoro komunumestro. Ha! Li kontentos pro tia honoro, ĉu? Kaj mi estas tia, ke mi lasos lin paroli duonhore pri la grafo duko kaj pri nia sinjoro hispana kastelestro, kaj mi pravigos lin pri ĉio, eĉ se li eldirus plej kolosajn fuŝaĵojn. Mi intermiksos vortetojn pri grafo onklo, ano de l' Sekreta Konsilio, kaj vi ja scias, kion efektas ĉi tiaj vortetoj ĉe l' orelo de sinjoro komunumestro. Entute, li pli multe bezonas nian protekton, ol vi mem lian indulgemon. Serioze mi agos, kaj mi iros al li, kaj mi lasos lin plej bonvola».

Post tiuj kaj tiaj paroloj, grafo Attilio foriris al ĉasado; kaj

Don Rodrigo restis, atendente maltrankvile la revenon de l' Grizulo. Li venis fin-fine, ĉirkaŭ la horo de tagmanĝo, kaj faris sian raporton.

La ĥaoso de tiu nokto estis tiel brua, la malapero de tri homoj el la vilaĝeto estis tia evento, ke kompreneble la esploroj, ĉu pro zorgo ĉu pro scivolo, estis multaj kaj pasiaj kaj insistaj; kaj aliflanke estis tro multe da homoj parte informitaj, por ke ĉiuj akordiĝu prisilenti ĉion. Perpetua tute ne povis aperi ĉe la pordo, sen ke unu aŭ alia ŝin superŝutus per demandoj, por sciigi, kiu do kaŭzis tian teruron al ŝia mastro; kaj Perpetua, repensante ĉiujn koncernajn cirkonstancojn, kaj fine komprenante, ke ŝin mem trompaĉis Agnese, tiom koleris kontraŭ tiu perfideco, ke ŝi bezonis ellasi iomete sian koleron. Verdire ŝi tute ne menciis la rimedon uzitan por ŝin trompaĉi: pri ĉi tio ŝi nenion elbuŝigis; sed la mistifikon faritan al ŝia povra mastro, ŝi tute ne povis prisilenti; kaj super ĉio, ke ĝin kombinis kaj provis tiu bonmora junulo, tiu bonvirta vidvino, tiu trapikita madoneto. Don Abbondio ja rezolute ordonegis kaj elkore petegis, ke ŝi silentadu; ŝi al li ja ripetadis, ke superfluas sugesti al ŝi aferon tiom klaran kaj memkompreneblan; tute certas, ke tiom granda sekreto sidis en la koro de la povra virino, kiel, en malnova kaj aĉe ringegita barelo, sidas vino tute nova, kiu plaŭdetas kaj bruetas kaj bolas, kaj, eĉ se ĝi ne elpafas la ŝtopilon, ĝi tamen tralasiĝas, traŝaŭmas kaj likas elinter daŭboj³, kaj tragutas ĉi tie kaj tie, tiel ke oni povas ĝin gustumi, kaj pli-malpli diri, kia vino ĝi estas. Gervaso, al kiu ŝajnis ne kredeble, ke ĉi-foje li estas pli informita ol ceteraj; al kiu ŝajnis ne eta gloro tio, ke li trasentis grandan teruron; al kiu ŝajnis, ke li fariĝis normala

³ *daŭboj*: kunigitaj kurbaj tabuletoj konsistigantaj barelon.

viro, pro tio, ke li tuŝis aferon, kiu odoraĉis kriminale, preskaŭ krevis pro l' deziro fanfaroni. Verdire Tonio, kiu serioze timis pri eblaj enketoj kaj procesoj, kaj pri praviĝo por doni, al li ordonegis, kun pugnoj antaŭ-vizaĝe, al neniu priparoli la aferon; tamen tute ne eblis sufoki en lia buŝo ĉian vorton. Cetere Tonio mem, restinte tiunokte eksterhejme en ne-kutima horo, reveninte kun ne-kutimaj paŝado kaj mieno, kaj kun anima ekscito, kiu lin disponis al sincero, ne povis maski la fakton al sia edzino; kiu ne estis muta. Maplimulte ol ĉiuj parolis Menico, ĉar, tuj kiam li rakontis al la gepatroj la okazaĵon kaj la kialon de sia ekspedicio, al ili ŝajnis tiel terure, ke ilia filo kontribuis fiaskigi entreprenon de Don Rodrigo, ke ili preskaŭ ne permesis la knabon fini la rakonton. Kaj ili plej energie kaj minace ordonis, ke li tute eĉ ne aludu ion ajn: kaj la postan matenon, taksante sin ne sufiĉe sekuraj, ili decidis teni lin enfermita hejme, tiutage kaj dum kelke da postaj tagoj. Sed kio? Ili mem pli poste, babilante kun la vilaĝanoj, kaj sen intenco montri sin pli informitaj ol ili, kiam la parolo temis pri tiu malklara punkto koncerne la fuĝon de niaj tri povruloj, kaj kiel kaj kial kaj kien, ili aldonis kiel konatan aferon, ke tiuj rifuĝis en Pescarenico. Tiel ankaŭ tiu ĉi detalo eniris en la komunajn parolojn.

Ĉiuj-ĉi fragmentoj, kunmetitaj kaj kunkudritaj laŭkutime, kun aldono de la franĝo kiun kompreneble oni alkudras, sufiĉis por konsistigi historion tian, ke ties certeco kaj klareco kontentigus ĉian plej kritikan intelekton. Sed tiu invado de l' bravuloj, okazaĵo tro grava kaj tro brua, por esti neglektata, kaj pri kiu tute neniu havis konkretan scion, ĝuste tiu okazaĵo konfuzis la tutan historion. Oni flustris la nomon de Don Rodrigo: pri tio ĉiuj konsentis; pri la cetero, ĉio estis nur

obskuro kaj plej diversaj konjektoj. Oni multe babilis pri l' du bravulaĉoj viditaj sur-strate ĉe l' vespero, kaj pri la alia, kiu staris ĉe la pordo de l' drinkejo; sed kian lumon eltiri el tiel seka fakto? Oni ja demandis la drinkejestrinon, kiu do klientis ĉe li hieraŭ vespere; sed la drinkejestro, se lin kredi, eĉ ne memoris, ĉu li vidis homojn tiun vesperon; kaj li emfazis, ke drinkejo estas kvazaŭ mar-haveno. Precipe konfuzis cerbojn kaj malkombinis konjektojn tiu pilgrimulo, vidita de Stefano kaj Carlandrea, tiu pilgrimulo, kiun la fiuloj volis murdi, kaj kiu foriris kun ili, aŭ kiun ili mem forkondukis. Kiu-cele li venis? Li estis purgatoria animo, aperinta por helpi la virinojn; li estis infer-damnita animo de kanajla, hipokrita pilgrimulo, kutime venanta dumnokte por kuniĝi kun malbonfaruloj, por plenumi fiaĵojn, kiajn li faris dum-vive; li estis viva kaj vera pilgrimulo, kiun ili volus murdi, timante ke li krios kaj vekos la vilaĝon; li estis (vidu do, kion oni eĉ imagas!) unu el tiuj fiuloj, ali-vestita kiel pilgrimulo; li estis ĉi tio; li estis tio alia, li estis tiom da aferoj, ke la tuta sagaco kaj sperto de l' Grizulo ne sufiĉus por malkovri la veron, se ĉi tiun parton de l' historieto li devus konkludi el alies babiloj. Sed, kiel la leganto scias, ĝuste tio kio konfuzaĉis la historion por aliaj, estis ĝuste plej klara por li: kaj uzante ĉi tiun ŝlosilon, por interpreti la sciigojn kolektitajn senpere aŭ per subrangaj esplorantoj, li sukcesis pri ĉio kunmeti sufiĉe detalan raporton por prezenti al Don Rodrigo. La Grizulo tuj enfermiĝis kun li, kaj informis lin pri la provo farita de la povraj gefianĉoj, kaj tio ja klarigis, kial do la domo troviĝis senhoma kaj la sonoriloj alarme sonoris, sen supozo, ke en la palaco de Don Rodrigo estas perfidulo, kiel estis dirintaj tiuj du honestuloj. La Grizulo informis pri la fuĝo; kaj ankaŭ pri tio troviĝis

kompreneblaj motivoj: la timo de l' gefianĉoj surprizitaj ĉe l' misfaro, aŭ averto pri l' invado, ricevita post ties malkovro, aŭ la tute ĥaosigita vilaĝo. Fine li diris, ke ili rifuĝis en Pescarenico; plue ne iris lia scio. Tre plaĉis al Don Rodrigo la certeco ke neniu lin perfidis, kaj la konstato, ke spuroj ne restas pri lia faro; sed temis pri eta kaj momenta plezuriĝo. «Fuĝis kune!» li ekkriis: «kune! Kaj tiu kanajla frataĉo! Tiu frataĉo!». La parolo eliris rasle elgorĝe kaj kriples tra l' dentoj, kiuj mordetis la fingron: la aspekto de Don Rodrigo estis fia kiel liaj pasioj. «Tiu frataĉo elpagos al mi. Grizulo! Mi ne estas mi mem... mi volas ekscii, mi volas trovi... ĉi-vespere, mi volas ekscii kie ili estas. Mi estas senpaca. Tuj al Pescarenico, por ekscii, por vidi, por trovi... Tuj kvar eskudojn, kaj mia ĉiama protekto. Ĉi-vespere mi volas ekscii. Kaj tiu kanajlo...! tiu frataĉo...!».

Jen la Grizulo denove aktiva; kaj vespere de tiu sama tago li povis raporti al sia inda mastro la deziratan sciigon: kaj jen kiamaniere.

Unu el plej grandaj plezuroj de l' homa vivo estas amikeco; kaj unu el la plezuroj de amikeco estas havi homon, al kiu konfidi sekreton. Nu, la amikoj ne estas duopaj, kiel la geedzoj; ĝenerale ĉiu havas da ili pli ol unu: kio konsistigas ĉenon, kies finon neniu povas trovi. Kiam do amiko al si havigas la plezuron demeti sekreton en la sinon de alia, li al tiu donas la emon ĝui saman plezuron. Verdire li petas, ke li nenion diru al iu ajn; kaj tia kondiĉo, se ĝin apliki strikta-sence, tuj ĉesigus la fluon de l' plezuroj. Sed la ĝenerala kutimo devigas konfidi la sekreton al neniu, krom al same fidinda amiko, al li trudante la saman kondiĉon. Tiele, de amiko fidinda al fidinda amiko, la sekreto cirkulas kaj cirkulas

tra tiu senmezura ĉenego, tiom ke ĝi atingas ĝuste la orelon de tiu aŭ tiuj, kiujn la unua parolinto intencis, ke ĝi neniam atingu. Tamen la sekreto ordinare devus resti survoje tre longe, se ĉiu havus nur po du amikoj: la diranton, kaj tiun al kiu transdiratas la ne-direnda afero. Sed ekzistas privilegiaj homoj, kiuj da amikoj havas centojn; kaj kiam la sekreto atingas unu el tiuj, la cirkuloj iĝas tiel rapidaj kaj multoblaj, ke ne plu eblas ilin spuri. Nia aŭtoro ne sukcesis ekscii, tra kiom da buŝoj pasis la sekreto, kiun la Grizulo laŭordone devis malkovri; certe estas ke la bonvirtulo eskortinta la virinojn ĝis Monza, reveturante per sia kaleŝo ĉirkaŭ la deksepa horo al Pescarenico, antaŭ ol atingi sian hejmon trafis en fidindan amikon, al kiu li tute konfidence rakontis la faritan bonfaron, kaj la ceteron; kaj certe estas, ke la Grizulo povis, post du horoj, rapidi al la domo, por raporti al Don Rodrigo, ke Lucia kaj ŝia patrino rifuĝis en monakinejo de Monza, kaj ke Renzo pluris ĝis Milano.

Don Rodrigo eksentis fian ĝojon el tiu disiĝo, kaj en li renaskiĝis iom da fia espero plenumi sian intencon. Dum granda parto de la nokto li cerbumis pri la rimedo; kaj li ellitiĝis frue, kun du planoj: la unua difinita, kaj la dua nur skizita. La unua estis: tuj sendi la Grizulon al Monza, por kolekti pli klarajn sciigojn pri Lucia, kaj ekscii, ĉu eblas ion provi. Li do tuj venigis sian fidelulon, al li donis kvar eskudojn, denove laŭdis lin pro la lerteco per kiu li gajnis ilin, kaj komunikis al li la deciditan ordonon.

«Sinjoro...» diris balanciĝe la Grizulo.

«Kio? ĉu mi ne parolis klare?».

«Se vi povus sendi alian...».

«Kiel?».

«Eminentega sinjoro, mi pretas riski mian haŭton por mia mastro: estas mia devo; sed mi ankaŭ scias, ke vi ne emas tro riskigi la vivon de viaj subuloj».

«Kio do?».

«Via eminentega moŝto ja scias pri l' nemultaj kapto-premioj pendantaj super mia kapo: kaj... Ĉi tie mi estas sub via protekto; ni estas amaso; la sinjoro komunumestro estas hejnamiko; la ĝendarmoj min respektas; kaj ankaŭ mi mem... la afero nemulte min honoras, ankaŭ mi mem, por kviete vivi... traktas ilin kiel amikojn. En Milano la livreo de via senjora moŝto estas konata; male en Monza... konata estas mi. Kaj ĉu via moŝto scias ke, mi diras modeste, la homo, kiu sukcesus liveri min al la justico, aŭ prezenti mian detranĉitan kapon, trafus grandan negoc-aferon? Cent eskudojn ĉiujn kune, krom la rajton liberigi du ekzilitojn.

«Diable!» diris Don Rodrigo: «nun vi al mi ŝajnas kvazaŭ malbrava hundo, kiu apenaŭ kuraĝas ataki la krurojn de pasanto ĉe l' pordo, retrorigardante, ĉu la domanoj favoras, sed ne aŭdacas malproksimiĝi!».

«Sinjoro mastro, mi kredas, ke mi pruvis...».

«Do».

«Do», reparolis fiere la Grizulo, tiel incitite, «do, via moŝto imagu, kvazaŭ mi estus nenion dirinta: kun leona koro kaj lepora kruro, mi pretas ekiri».

«Kaj mi ne diris, ke vi iru tutsola. Kunprenu kun vi du el la plej lertaj: la Strek-vunditon kaj la Sen-haltan; kaj iru fideme, kaj vi estu la Grizulo. Diable! Kiu do ne konsentus tralasi tri ulojn, kiaj vi estas, irantajn por siaj aferoj? Necesus ke la ĝendarmoj de Monza tute sentus naŭzon pri la vivo, por veti ĝin kontraŭ cent eskudoj en tiel danĝera ludo. Kaj krome,

krome... mi ne kredas min tiuloke tiel malkonata, ke neniom valoras esti mia servanto».

Iom hontiginte tiele la Grizulon, li aldonis pli ampleksajn kaj detalajn instrukciojn. La Grizulo kunprenis la du kompanojn, kaj ekiris kun gaja kaj braveca mieno, sed en sia koro blasfemante Monza-n, kaj kapto-premiojn, kaj inojn, kaj kapricojn de l' mastroj; kaj li marŝis kiel lupo, kiu, instigite de l' malsato, kun ŝrumpa ventro kaj reliefaj ripoj, desupras de siaj montoj, kie troveblas nur neĝo, kaj suspekteme avancas en ebenaĵon, ekhaltas de temp' al tempo, kun levita piedo, svingante sen-haran vostaĉon,

Levas muzelon, flarante je vento malfida,

ĉu ĝi alportas odoron pri hom' aŭ pri fero: ĝi streĉas la pintajn orelojn, kaj turnas la du sangecajn okulojn, kiuj reflektas samtempe avidon al predo kaj teruron pri ĉaso. Cetere, se iu volus ekscii de kie devenas tiu bela verso, ĝi estas tiritita el diablaĵo, ne eldonita sed baldaŭ eldonota, pri kruc-militoj kaj Lombardoj⁴, kiu faros sufiĉe da bruoj; kaj mi ĝin prenis, ĉar mi trovis ĝin trafa; kaj mi citas la fonton, por ne pavi⁵ per alies havaĵo: kaj neniun pensu, ke estas miaflanka ruzaĵo, por sciigi ke la aŭtoro de l' diablaĵo kaj mi estas kiel fratoj, tiel ke mi traserĉas laŭplaĉe liajn manuskriptojn.

Kiel duan aferon, Don Rodrigo zorgis eltrovi rimedon, por malebligi rekuniĝon de Renzo al Lucia, kaj lian revenon

⁴ Verso el poemego: *La Lombardoj je l' unua Krucmilito*, de Tommaso Grossi (1790-1853), romantika verkisto, amiko de Manzoni, kiu ŝerce aludas tiun intiman amikecon.

⁵ *pavi*: fiere kaj fanfarone paradi.

en la vilaĝon; kaj ĉi-cele li cerbumis disvastigi tra la popolo onidirojn pri minacoj kaj embuskoj, kiuj, atingante tra amikoj la orelon de Renzo, forigu de li la emon reveni al tiuj lokoj. Li tamen opiniis, ke estus plej sekure, se lin ekzili for de la lando; kaj por tion sukcesi, li pensis, ke pli ol perforto povas helpi justico. Ekzemple, oni povus iom troigi la atencon de li faritan en la pastrejo, prezenti ĝin kiel agreson, kiel ribelon, kaj per la advokato komprenigi al la komunumestro, ke estas kazo por eligi kontraŭ Renzo trafan arest-ordonon. Sed poste li pensis, ke al li ne konvenas tuŝi tiun aĉan aferon; kaj sen plua cerbumo li decidis malfermi sin al doktoro Impliktrafulo kiom sufiĉas, por al li subkomprenigi sian deziron. – Da kri-leĝoj estas tiom multe! – li pensis – kaj la doktoro tute ne estas ansero: ion taŭgan por mia kazo, li kapablos eltrovi, ian implikon por trafi tiun kampulaĉon: se ne, mi ŝanĝas lian alnomon! – Sed (jen kiel iras foje ĉi-mondaj aferoj!) dum Don Rodrigo pensis, ke la doktoro estas la homo plej taŭga por lin servi ĉe tio, jen: alia homo, kiun neniu imagus, nome Renzo mem, tut-kore aktivis por lin servi laŭ maniero pli certa kaj rapida ol kiom la doktoro povus iam ajn eltrovi.

Mi vidis plurfoje karan infanon⁶, verdire pli viglan ol bezone, sed kiu, laŭ ĉiuj indicoj, montras la intencon fariĝi honesta viro; mi plurfoje lin vidis, ĉe l' vesperiĝo, okupita endomigi sian gregon da kobajoj⁷, kiujn dumtage li lasis libere diskuri en ĝardeneto. Li volus enirigi en la kuŝejon ĉiujn samtempe; sed estis vana penado: unu el-gregiĝis dekstren, kaj dum la eta paŝtisto kuris por ĝin repeli en la gregon, jen unu, du tri aliaj eliris maldekstren, kaj ĉiufanken. Tiel ke fine li

⁶ *infanon*: Manzoni aludas sian filon.

⁷ *kobajoj*: etaj malsovaĝaj ronguloj.

iom senpacienciĝis, cedis al ilia kaprico, enpelis unue la plej proksimajn al la pordeto, kaj pli poste iris rekonduki la aliajn po unu, po du, po tri, laŭpove. Similan ludon konvenas ke faru ni mem pri niaj roluloj: rifuĝiginte Lucia-n, ni rapidis al Don Rodrigo; kaj nun ni devas lin forlasi, por sekvi Renzon, kiu malaperis el nia vid-kampo.

Post la malĝoja adiaŭo, kiun ni rakontis, Renzo el Monza marŝis direkte al Milano, kun la anim-sentoj, kiajn ĉiu povas facile imagi. Forlasi la hejmon, preterlasi la metion, kaj, kio estis super ĉio, foriĝi de Lucia, troviĝi survoje, ne sciante kie li haltos; kaj ĉion ĉi kaŭzis tiu kanajlo! Kiam li fiksis la person super unu aŭ alia el ĉi-aferoj, tiam li tute dronis en kolero kaj vengemo; sed poste li rememoris tiun preĝon, kiun ankaŭ li mem recitis kun la bona frato en la preĝejo de Pescarenico; kaj li pentis. La kolersento revekiĝis; sed vidante sanktan bildon surmure, li levis la ĉapelon, kaj haltis por preĝi denove; tiel ke, dum tiu vojaĝo, almenaŭ dudek-foje li en sia koro murdis kaj revivigis Don Rodrigon. Tiutempe la vojo estis tute profunda inter du krutaj bordoj, koto-plena kaj ŝtonoza, kun profundaj rado-sulkoj, kiuj postpluve fariĝis kvazaŭ riveretoj; kaj en pli malaltaj partoj ĝi tute inundiĝis, tiel ke oni tie povus preskaŭ boati. En tiaj punktoj, kruta ŝtupa pasejo sur la bordo montris, ke aliaj pasantoj trabatis al si vojon tra l' kampoj. Renzo, alsuprinte tra unu el tiaj pasejoj al pli alta tereno, ekvidis la gigantan Milanan katedralon, solan en la ebenaĵo, kvazaŭ ĝi elstarus ne elmeze de urbo, sed en dezerto, kaj tuj li ekhaltis, forgesante ĉiujn siajn malfeliĉojn, por kontempli eĉ de fore tiun okan mirindaĵon, pri kiu tiom multe li aŭdis rakonti ek de sia infanaĝo. Sed post kelke da momentoj, retrorigardante, li ekvidis ĉe l' horizonto tiun ne-

regulan kreston de montoj, li distingis alta inter ili sian *Resegone*-monton, li sentis sian tutan sangon ekscitiĝi, li restis iom-tempe, triste rigardante tiu-direkten, kaj poste li triste sin turnis kaj daŭrigis sian vojon. Iom post iom li komencis distingi kampanilojn kaj turojn kaj kupolojn kaj tegmentojn; tiam li desupris en la ŝoseon, li marŝis ankoraŭ iomtempe, kaj kiam li konsciis, ke li apudas al la urbo, li proksimiĝis al vojaĝanto kaj, sin klininte laŭpove plej bontone, al li diris: «Bonvolu, ho sinjoro».

«Kion vi volas, bona junulo?».

«Ĉu vi povas indiki al mi plej kurtan vojon por iri al la kapucenejo, kie loĝas patro Bonaventura?».

La viro, al kiu Renzo sin turnis, estis riĉeta loĝanto de l' ĉirkaŭaĵo, kiu, irinte matene al Milano por iuj negoc-aferoj, estis tute rapide revenanta, nenion plenuminte, kaj malpacienca atingi sian hejmon, kaj tre volonte li evitus tiun haltigon. Malgraŭ tio, montrante nenian malpaciencon, li respondis tre ĝentile: «kara knabo, da monakejoj estas pli ol unu: necesus ke vi scipovu diri pli klare, kiun el ili vi serĉas». Tiam Renzo eligis el la sino la leteron de patro Cristoforo, kaj ĝin montris al tiu sinjoro, kiu leginte: Orienta Pordego, ĝin redonis al li, dirante: «bona junulo, vi estas bonŝanca; la kapucenejo, kiun vi serĉas, estas ne for de ĉi tie. Eniru ĉi tiun strateton maldekstre: temas pri kurt-vojo: post kelke da minutoj vi atingos angulon de longa malalta konstruaĵo: ĝi estas la kontaĝulejo; laŭiru la fosaĵon, kiu ĝin ĉirkaŭas, kaj vi atingos Orientan Pordegon. Eniru tra ĝi, kaj post tri aŭ kvar cent paŝoj, vi vidos malgrandan placon kun belaj ulmoj: tie staras la monakejo: vi ne povas erari. Helpu vin Dio, bona junulo». Kaj akompanante la lastajn vortojn per afabla man-

gesto, li foriris. Renzon mirigis kaj edifis la afableco de l' urbanoj rilate al kamparanoj; sed li ne sciis, ke temas pri eksterordinara tago, en kiu nobel-manteloj sin klinas al popolkajetoj. Li trairis la indikitan vojon, kaj atingis l' Orientan Pordegon. Sed ĉe tiu nomo la leganto ne fantaziu pri la vidaĵoj kun ĝi ligitaj nuntempe. Kiam Renzo eniris tra tiu pordego, la ekstera strato rektis nur laŭlonge de la tuta kontaĝulejo; poste ĝi iris serpentuma kaj mallarĝa inter du heĝoj. La pordego konsistis el du pilastroj kun tegmenteto por ŝirmi la pordoklapojn kaj, ĉe unu flanko, budo por la akcizistoj. La muregoj deklivis ne-regule, kaj la grundo estis malglata kaj hirta pro rompaĵoj kaj ruboj sen-orde dis-ĵetitaj. La strato, kiun vidis homo eniranta tra tiu pordego, ne estis malsimila ol tiu, kiu nuntempe aperas al eniranto tra Tosa-Pordego. Preskaŭ ĝis la pordego, kanaletoj trais la strat-mezon, dividante ĝin en du serpentumajn stratetojn, kovritajn, laŭ la sezono, de polvo aŭ koto. En la loko kie estis, kaj ankoraŭ estas, strateto nome Borghetto, la kanalo finiĝis per kloako. Tie staris kolono, nome de sankta Dionizio, kun supra kruco: dekstre kaj male kuŝis heĝitaj legomejoj, kun sporadaj dometoj, plejparte loĝataj de tol-lavistoj. Renzo eniras, pasas: neniu el la akcizistoj lin priatentas: la afero ŝajnis al li stranga, ĉar el la malmultaj homoj el lia vilaĝo, kiuj rajtis fieri, ke ili atingis Milanon, multe li aŭdis pri traserĉoj kaj esplor-demandoj, kiujn devis suferi alvenantoj el la kamparo. La strato estis sen-homa, tiel ke, se li ne aŭdus foran murmuron, kiu indikis grandan movadon, al li ŝajnus eniri en ne-loĝatan urbon. Dum li plu-iris, ne sciante kion pripensi, li vidis surtere iajn blankajn molajn striojn, kvazaŭ neĝon; sed neĝo ĝi ne povis esti, ĉar kutime ĝi ne venas strio-forme, nek tiu-sezone. Li sin

klinis super unu el ili, rigardis, tuŝis, kaj li trovis ke ĝi estas faruno. – Tutcerte estas abundego en Milano, – li diris al si mem, – se oni tiumaniere fuŝaĉas Diajn donacojn. Kaj oni al ni kredigis, ke malsatego estas ĉiuloke. Jen kion oni faras, por teni la povran kampularon kvieta! – Sed, post kelke da paŝoj, kiam li preskaŭ atingis la kolonon, li vidis ĉe ties bazo ion eĉ pli strangan; sur la piedestalaj ŝtupoj li vidis disajn objektojn, kiuj certe ŝtonoj ne estis, kaj, se ili kuŝus sur vendo-benke de bakisto, oni tute ne hezitus ilin nomi panoj. Renzo ne aŭdacis tuj kredi al siaj okuloj; ĉar, diable! tiu ne estis loko por pano. – Mi vidu, kia afero ĝi estas, – li diris ankoraŭ en si mem; li iris al la kolono, sin klinis kaj kaptis unu el ili: vere estis ronda, blankega pano, kian Renzo manĝi kutimis nur okaze de solenaj festoj. – Vere ĝi estas pano! – li diris laŭtvoĉe; tiom granda estis lia miro: – ĉu tiel ĉi oni disemas ĝin en ĉi-urbo? En ĉi tia jaro? kaj oni eĉ ne sin ĝenas levi ĝin, kiam ĝi falas? ĉu eble tie ĉi estas Kuk-lando? – Post dekmejla marŝado, ĉe l' ne-varma matena venteto, tiu pano ekscitis la apetiton krom la miron. – Ĉu preni ĝin? – li sin demandis: – ba! oni lasis ĝin ĉi tie elmetita al la hundoj; do same rajtas ĝin ĝui eĉ kristano. Entute, se aperos la mastro mi ĝin pagos. – Tiel pensante, li metis en unu poŝon la panon, kiun li tenis en-mane; li prenis duan kaj ĝin metis en la alian; li prenis trian, kaj komencis manĝi; kaj li pluiris, pli malcerta ol iam ajn, kaj scivola klarigi al si mem, pri kia historio temas. Apenaŭ ekirinte, li vidis homojn veni elinterne de la urbo, kaj li atente rigardis la unuajn. Temis pri viro, virino, kaj kelkpaŝe post ili granda knabo; ĉiu el ili sub pezaĵo, kiu ŝajnis super iliaj fortoj, kaj ĉiuj estis strang-aspektaj. La vestaĵoj (aŭ ĉifonoj) estis farunumitaj; la vizaĝoj estis same farun-polvitaj kaj krome

kuntiritaj kaj ardaj; kaj ili marŝis ne nur kurbaĵoj, sed doloraj, kvazaŭ estus iliaj ostoj draŝitaj. La viro pene tenis surŝultre grandan farun-sakon kun disaj truoj, kiu dissemis iom da faruno ĉe ĉiu stumbleto, ĉe ĉiu misekvilibra movo. Sed pli fia estis la aspekto de la virino: senmezura ventregio, kiu ŝajnis pene tenata per du fleksitaj brakoj, kvazaŭ ĝi estus dancansa kaldronaĉo; kaj el sub tia ventregio aperis du kruroj nudaj ĝis supergenue, kiuj ŝancele antaŭen venis. Renzo rigardis pli atente, kaj li vidis, ke tiu dika ŝvelaĵo estas ŝia jupo, tenata je la sub-rando, enhavante kiom da faruno ĝi kapacitis, kaj eĉ pli multe; tiel ke preskaŭ ĉiupaŝe parteto de ĝi forbloviĝis. La granda knabo ambaŭ-mane tenis surkape plen-plenan panujon; sed, ĉar estis liaj kruroj malpli longaj ol tiuj de la gepatroj, iom post iom li post-restis; kaj kiam de temp' al tempo li plirapidiĝis, por ilin atingi, la pankorbo perdis ekvilibron, kaj kelke da panoj elfalis. «Forĵetu ankoraŭ alian, vi sentaŭgulo», diris la patrino, grincigante la dentojn kontraŭ la knabo.

«Ne mi forĵetas ilin; ili falas per si mem: kion fari?» li respondis.

«He! Bonŝance al vi, ke mi havas la manojn okupitajn», reparolis la virino, skuante la pugnojn, kvazaŭ ŝi donus energian skuon al la povra knabo; kaj per tiu movo ŝi forfaligis pli da faruno, ol kiom bezonus por fari la du panojn ĵus faligitajn de la knabo. «Nu, nu», diris la viro: «ni revenos por ilin repreni, aŭ alia homo ilin prenos. Jam delonge oni malsatas: nun kiam venas iom da abundo, ni ĝuu ĝin tute pace».

Dume aliaj homoj alvenis el la pordego; kaj unu el tiuj, alirinte la virinon, ŝin demandis: «Kien iri, por preni panon?».

«Pli antaŭen,» ŝi respondis; kaj kiam tiuj foriĝis dek

paŝojn, ŝi aldonis grumblante: «ĉi-friponaj kampuloj venos pribalai ĉiujn bakejojn kaj ĉiujn provizejojn, kaj nenio plu restos por ni».

«Po iom por ĉiu, ho turmenta virino», diris la edzo: «abundon, abundon!».

El tiuj kaj tiaj aferoj, kiujn li vidis kaj aŭdis, Renzo komencis konscii, ke li trafis en ribelantan urbon, kaj ke estas tago de konkero, tio estas: ke ĉiu kaptas proporcie de sia avido kaj forto, kaj pagas per batoj. Malgraŭ nia deziro havigi bonan impreson pri nia povra montarano, tamen historia sincereco nin devigas diri, ke lia unua sento estis plezuriĝo. Tiom malmulte li havis por gratuli pro l' ordinara irado de la aferoj, ke li emis aprobi ĉion, kio iel ajn povas ĝin ŝanĝi. Kaj cetere, ĉar li tute ne estis super la nivelo de sia jarcento, ankaŭ li mem kuŝis en tiu opinio aŭ komuna pasio, ke la mankon de pano kaŭzis la akaparistoj kaj bakistoj; kaj li inklinis pravigi ĉian rimedon, por elŝiri el iliaj manoj la nutraĵon, kiun, laŭ tia opinio, ili kruele rifuzis al la malsato de la tuta popolo. Tamen li decidis resti ekster la tumulto, kaj li ĝojis, ke li estas iranta al kapuceno, kiu trovos por li gastlokon, kaj al li rolos kiel patro. Tion pensante, kaj dume rigardante la novajn konkerantojn venantajn ŝarĝite per predo, li trairis la parteton de vojo, kiu ankoraŭ restis, por atingi la monakejon.

Kie nun staras tiu bela palaco kun tiu alta loĝio⁸, tie staris, kaj restis ĝis antaŭ ne multe da jaroj, malgranda placo, kaj ĉe ties ekstremo la preĝejo kaj la kapucenejo, kun antaŭe kvar grandaj ulmoj. Ne sen envio ni gratulas al tiuj el niaj legantoj, kiuj ne vidis la aferojn en tiu stato: tio signifas, ke ili estas tre

⁸ *loĝio*: malfermita parto, eventuale kun kolonoj kaj arkaĵoj, en supera parto de domo aŭ palaco.

junaj, kaj ne havis tempon fari multe da fuŝaĵoj. Renzo rekte iris al la pordo, li metis en la sinon la duonan pan-bulon, kiu al li restis, li eligis kaj tenis en-mane la leteron, kaj li sonorigis la tintilon. Malfermiĝis kradita ĝiĉeto,⁹ kaj aperis la vizaĝo de la frato pordisto, por demandi kiu do estas.

«Viro el la kamparo, kiu portas al patro Bonaventura urĝan leteron de patro Cristoforo».

«Donu ĉi tien», diris la pordisto, etendante manon al la krado.

«Ne, ne», diris Renzo: «mi mem devas liveri ĝin en liajn manojn».

«Li ne estas en la monakejo».

«Lasu min eniri, kaj mi atendos lin».

«Faru laŭ mia konsilo», respondis la frato: «iru atendi en la preĝejo, tiel ke dume vi povos fari ion bon-meritan¹⁰. En la monakejon nunmomente neniu rajtas eniri». Kaj tion dirinte, li refermis la ĝiĉeton. Renzo restis tie, kun sia letero enmane. Li faris dek paŝojn direkte al la preĝeja pordo, por sekvi la konsilon de la pordisto, sed li decidis ekrigardi antaŭ tio la tumulton. Li transiris la placeton, atingis la randon de la strato, kaj ekhaltis kun la brakoj krucitaj surbruste, por rigardi maldekstren, direkte al la interno de la urbo, kie la svarmo estis pli densa kaj pli brua. La vortico¹¹ suĉtiris la spektanton. – Mi iru vidi, – li diris en si mem; li eligis sian duonan panon, kaj, mordetante ĝin, li ekiris tiudirekten. Dum li ekiras, ni rakontos, kiel eble plej koncize, la kaŭzojn kaj starton de tiu renversego.

⁹ *ĝiĉeto*: fenestreto, por komuniki kaj por transdoni objektojn.

¹⁰ *fari ion bon-meritan*: t.e. preĝi.

¹¹ *vortico*: ĝenerale: kirliĝa aŭ rotacia fluaĵo; ĉi tie: tumulto.

XII

Tiam estis la dua jaro de magra rikolto. Dum la unua, la provizoj restintaj el la pasintaj jaroj iel kompensis la mankon; kaj la popolo ĝisvivis, nek sata nek malsata, sed certe tute senproviza, ĝis la rikolto de la 1628-a jaro, kiam aktualis nia historio. Nu, tiu sopirata rikolto estis eĉ pli mizera ol la antaŭa, parte pro l' malfavora vetero (ne nur en Milano, sed en vasta ĉirkaŭregiono); kaj parte pro homa kulpo. La fuŝoj kaj malŝparoj de l' milito, de tiu bela milito, de ni jam menciita, estis tiaj ke, en la regiono al ĝi proksima, pli multe da kampoj ol kutime restis nekultivataj kaj forlasitaj de l' kampuloj, kiuj anstataŭ perlabori panon por si kaj por aliaj, estis devigitaj almozpeti ĝin. Mi diris: pli ol kutime; ĉar la ne elteneblaj impostoj, truditaj kun same senlimaj avido kaj stulteco, kaj la kutima konduto, eĉ en paca tempo, de la soldataroj loĝigitaj en la vilaĝoj, konduto, kiun la dolor-plenaj tiamaj dokumentoj komparas kun tiu de invadinta malamiko; kaj krome aliaj kaŭzoj, kiujn ne konvenas mencii ĉi tie: ĉio tio jam estigis iom post iom tiun bedaŭrindan efikon en la tuta Milano: la specifaj cirkonstancoj, kiujn ni nun mencias, estigis kvazaŭ subitan akutiĝon de kronika malsano. Kaj tiu ajna rikolto ankoraŭ ne estis stokita, kiam la por-armeaj provizadoj, kaj la malŝparoj, kiuj kutime ilin akompanas, kaŭzis tian malplenon, ke tuj sentiĝis la malabundo, kaj kun ĝi ties bedaŭrinda, sed bonefika kaj samtempe neevitebla sekvaĵo, nome la prez-altiĝo.

Sed kiam ĉi-lastata atingas certan gradon, ĉiam en la popolamaso estiĝas (aŭ almenaŭ ĝis nun estiĝis; kaj se

ankoraŭ nun, post tiom da talentulaj verkoj¹, imagu tiuepoke!), la opinio, ke pli-kariĝo ne dependas de malabundo. Oni forgesas, ke oni ĝin timis kaj prognozis; oni subite supozas, ke da tritiko estas sufiĉe, kaj ke la malbono dependas de tio, ke da ĝi oni ne vendas sufiĉe por la konsumo: supozoj tute senbazaj, sed flatantaj samtempe koleron kaj esperon. La veraj aŭ imagaj tritiko-akaparistoj, la bienuloj, kiuj la tutan tritikon ne vendis unu-tage, la bakistoj kiuj da ĝi aĉetis, entute ĉiuj, kiuj da ĝi havis ete aŭ multe, aŭ famis kiel havantoj; ĉi-ĉiujn oni kulpigis pri manko kaj kariĝo, ĉi-ĉiujn celis la universala grumblado kaj abomeno de la aĉe kaj bele vestita popolo. Oni diris kun certeco, kie situas la stokejoj, la grenejoj plenaj, superplenaj, trabe apogitaj; oni citis tute nekredeblan nombron da sakoj; oni parolis kun certeco pri senmezura kvanto da greno ekspedata sekrete en aliajn landojn, kie verŝajne kun sama certeco kaj egala indigno oni kriaĉis, ke la tieaj grenaroj migras al Milano. Oni postulis de la publikaj estraroj la dispoziciojn, kiuj al la popolamaso ĉiam ŝajnas, aŭ almenaŭ ĝis nun ŝajnis, tute justaj, tute simplaj, tute taŭgaj por eligi la tritikon onidire kaŝitan, formasonitan, subterigitan, kaj restarigi abundon. La aŭtoritatuloj ion faris: ekzemple ili fiksis la maksimuman prezon de certaj nutro-varoj, minacis punojn al rifuzantoj vendi, kaj aliajn similajn dekretojn. Sed ĉar ĉiaj mondaj dispozicioj, kiom ajn drastaj, tute ne povas malpliigi la nutraĵ-bezonon, nek aperigi rikoltojn ekster-sezone; kaj ĉar

¹ Aludo al verkoj pri ekonomiko. Manzoni, favora al liberismo – t.e. libera merkato – ironias pri la ŝtataj dispozicioj, laŭ li ĉiuokaze fuŝantaj la sanan ekonomion. Li pesimisme emfazas la stultecon unuflanke de kanceliero Ferrer, kiu kaŭzis ekonomian katastrofon, aliflanke de la popolo, kiu taksis lin eminenta bonfaranto.

speciale ĉi tiuj dispozicioj tute ne havis la povon altiri nutrovarojn el la lokoj, kie ili eventuale superfluus; konsekvence la malbono pludaŭris kaj eĉ pligraviĝis. La popolamaso taksis tion rezulto de malsufiĉaj kaj senenergiaj dispozicioj, kaj kriege postulis aliajn pli fortajn kaj pli rezolutajn. Kaj, pro sia malfeliĉo, la popolo trovis la homon laŭ sia koro.

Dum foresto de guberniestro Don Gonzalo Fernandez de Cordova, kiu komandis la sieĝon de Casale Del Monferrato, lin anstataŭis en Milano grand-kanceliero Antonio Ferrer, ankaŭ li mem hispano. Li vidis (kaj kiu ne vidus?) ke pano ĝustapreza estus en si mem tre dezirinda afero; li pensis (kaj tio estis lia eraro) ke lia ordono sufiĉos, por ĝin estigi tia. Li do fiksis por la pano la takson, tio estas lim-prezon, kiu estus ĝusta, se la ordinara kosto de unu tritiko-buŝelo estus tridek liroj; sed oni vendis ĝin eĉ je okdek liroj. Li agis kiel eks-juna virino, kiu opinias juniĝi manipulante sian bapto-atestilon².

Plurfoje ordonoj ne tiel stultaj nek tiel maljustaj restis neplenumitaj, pro rezisto de la aferoj mem; sed super la plenumo de ĉi tiu viglis la popolamaso, kiu, vidante, ke fine ĝia deziro fariĝis leĝo, ne tolerus, ke tio estus nur ŝerco. La popolo tuj rapidis al la bakejoj peti panon je l' taksita prezo, kaj ĝin postulis kun la rezoluteco kaj minacemo, kiuj devenas el kuniĝo de pasio, forto kaj leĝo. Ne demandu, ĉu la bakistoj kriegis. Senpaŭze akvumi, knedi, en- kaj el-bakujigi; ĉar la popolo, konfuzite sentante ke temas pri io perforta, sieĝis la bakejojn seninterrompe, por ĝui la fean³ abundon, dum ĝi daŭras; penegi do, kaj ŝvitegi pli ol kutime, por malgajni: ĉiu komprenas kia plezuro devas esti. Sed unuflanke la

² *bapto-atestilo* en kristanaj landoj rolis kiel legitimilo.

³ *fean*: fabelan, kvazaŭ miraklan.

aŭtoritatuloj, kiuj minacis punojn, aliflanke la popolo, kiu postulis servon, kaj, se apenaŭ bakisto hezitis, ĝi urĝis kaj grumblis per sia-tia voĉego, kaj minacis fari unu el siaspecaj justecoj, kiuj estas plej fiaj en la mondo; ne troveblis eskapo: nepris knedi, en- kaj el-bakujigi, kaj vendi. Sed, por daŭrigi ĉi tion, ne sufiĉis ordonego, nek timego; necesus povi: kaj, se tia situacio iomete pludaŭrus, ili ne plu povus. Ili do klarigis al la magistratanoj, ke la pezo al ili trudita estas maljusta kaj ne-eltenebla, ili deklaregis, ke ili enĵetos la bakŝpaton en la bakujon kaj foriros; kaj dume ili daŭrigaĉis laŭpove, esperante, esperante, ke iam ajn la grand-kanceliero komprenos ĝustan rezonon. Sed Antonio Ferrer, kiu estis tio, kion oni difinus viro kun firma karaktero, respondis ke la bakistoj multe kaj multe profitis pasintece, ke ili multe kaj multe profitos ĉe l' reveno de abundo; ke ankaŭ oni vidos, oni eble pripensos doni al ili ian kompenson; ke dume ili ankoraŭ eltenu. Aŭ li mem vere estis konvinkita pri la praveco de l' rezonoj, kiujn li esprimis, aŭ eble, eĉ konante el la efikoj la neblon gardi la dekreton, li volis lasi al aliaj la abomenon pro ties nuligo: ĉar kiu povas nun eniri en la cerbon de Antonio Ferrer? fakte estas, ke li restis firma ĉe sia decido. Fine la dek-estroj (urba instanco el nobeloj, kiu daŭris ĝis la naŭdekseca jaro de la pasinta jarcento) informis letere la guberniestron pri la stato de la aferoj: ke li mem trovu rimedon, por ilin funkciigi.

Don Gonzalo, implikite ĝisplande en la milit-aferoj, faris tion, kion la leganto certe imagas: li nomumis komisionon, kiun li rajtigis fiksi por la pano ĝustan prezon, tiel ke ambaŭ flankoj povu vivteni sin. La komisionanoj kunvenis, aŭ, kiel oni ĉi tie hispaneske diris en la tiama sekretarieska ĵargono, ili

juntiĝis: kaj post mil riverencoj, komplimentoj, antaŭparoloj, suspiroj, suspendoj, aeraj eldiroj kaj hezitoj; fine, trenite al rezolucio, kiun ĉiu sentis necesa, eĉ konsciante ludi gravan lud-karton, sed konvinkite, ke nenio alia fareblas, ili konkludis plikarigi la panon. La bakistoj ekspiris; sed la popolo furioziĝis.

Vespere antaŭ la tago, en kiu Renzo atingis Milanon, tra stratoj kaj placoj svarmis viroj, kiuj, trenate de komuna kolero, regate de komuna penso, konatoj kaj nekonatoj, senkonsente kaj preskaŭ senkonscie formis grupetojn, kiel kunfluas disaj gutoj sur sama deklivo. Ĉiu parolo plifortigis la konvinkon kaj pasion de la aŭskultantoj, kiel ankaŭ de la parolanto mem. Inter tiom da pasiuloj, estis iuj pli frid-sangaj, kiuj kun granda plezuro rimarkis ke la akvo malklariĝas; kaj klopodis igi ĝin eĉ pli kota, per tiaj rezonoj, per tiaj historietoj, kiajn ruzuloj scipovas kunmeti kaj pasiaj animoj scipovas kredi; kaj ili intencis ne lasi tiun akvon kvietiĝi, sen iom da fiŝkaptado. Miloj da homoj enlitiĝis kun konfuza sento, ke ion nepras fari, ke ion oni ja faros. Jam antaŭ tagiĝo, en la stratoj denove svarmis disaj homgrupoj: infanoj, virinoj, viroj, maljunuloj, laboristoj, malriĉuloj ariĝis hazarde: ĉi tie konfuza multvoĉa murmuro; tie unu predikis kaj ceteraj aplaŭdis; ĉi tiu turnis al sia najbaro la saman demandon, ĵus al li adresitan; alia ripetis la elkrion, ĵus sonintan je liaj oreloj; ĉie plendoj, minacoj, mir-esprimoj: malgranda vort-provizo konsistigis la materialon de tiom da paroloj.

Nur mankis oportunaĵo, instigo, ajna startigo, por igi la dirojn faroj; kaj tiaĵo ne longe malfruis. Ĉe l' tagiĝo eliris el la bakistaj butikoj la helpoknaboj kun dorsokorboj plenplenaj de pano, por disporti al la kutimaj hejmoj. La apero de unu el ĉi

tiuj mis-sortaj knaboj en loko, kie staris unu el tiuj homrondoj, efikis kvazaŭ falo de artifika-fajreto en pulvejon. «Vidu, ĉu ĉeestas da pano!» kunkriis cent voĉoj. «Jes, por la tiranoj, kiuj naĝas en abundo kaj volas mortigi nin per malsato», diras unu; li proksimiĝas al la knabo, kaptegas per unu mano la randon de la dorsokorbo, ĝin skuegas kaj diras: «montru do». La knabeto ruĝiĝas, paliĝas, ektemas, provas diri: lasu min; sed la parolo mortiĝas enbuŝe; li malstreĉas la brakojn kaj strebas ilin rapide liberigi el la korbo-rimenoj. «La korbon teren!» oni krias dume. Multaj manoj ĝin kaptas samtempe; ĝi staras tere; oni forĵetaĉas la kanvason⁴, kiu ĝin kovras: varmeta panparfumo disvastiĝas ĉirkaŭen. «Ankaŭ ni mem estas kristanoj: ankaŭ ni mem bezonas panon», diras la unua; li prenas rondan panbulon, ĝin levas, montrante ĝin al la popolamaso, ĝin ekmordas. Manoj enkorben, panoj supren: pli rapide ol rakontite, estis detabligite. La nenion trafintaj, incitite ĉe l' vido de alies gajno, instigite pro l' facilo de l' entrepreno, ekiris grupope serĉi aliajn dorskorbojn: kiom da renkontitaj, tiom da prirabitaj. Kaj oni eĉ ne bezonis ataki la portantojn: tiuj kiuj, pro sia malfeliĉo, troviĝis surstrate, vidante la aĉan situacion, spontane demetis la portaĵon, kaj plej rapide for! Malgraŭ tio, senkompare plimultis tiuj, kies dentoj restis senpane; eĉ la konkerintoj ne kontentis pri tiel bagatelaj predoj; kaj krome, mikse kun unuj kaj aliaj, staris homoj celantaj al grandioza ĥaoso. «Al la bakejo! al la bakejo!» oni krias.

En strato nome Corsia De' Servi staris, kaj ankoraŭ staras, bakejo, kiu gardas la tiaman nomon; nomon kiu itallingve signifas Lam-baston-bakejon, kaj en la Milana dialekto

⁴ *kanvason*: malfajnan tolon.

konsistas el vortoj tiel malregulaj, tiel krudaj kaj sovaĝaj, ke la alfabeto ne havas taŭgajn literojn, por indiki ilian sonon. Tien eksturmis la popolo. Dum la butikanoj pridemandis la helpoknabon, ĵus revenintan senŝarĝe, kiu, tute timigite kaj taŭzite, balbute raportis sian misaventuron, jen aŭdiĝas paŝbruado kaj samtempe kriado; tio pliiĝas kaj proksimiĝas; aperas la avangardo de la hom-kolektaĉo.

Agitiĝo kaj urĝiĝo: iu kuras peti helpon de la justikapitano; la aliaj rapide fermas la butikon kaj trabapogas la pordo-klapojn. La popolo komencas amasiĝi ekstere, kaj krii: «panon! panon! malfermu! malfermu!». Post kelke da momentoj alvenas la justikapitano, kun eskorto de halebardistoj. «Spacon, spacan, filetoj: hejmen, hejmen; havigu lokon al la justica kapitano», krias li kaj la halebardistoj. La popolo, ankoraŭ ne tro densa, liberigas iom da spaco; tiel ke ili sukcesis alveni kaj posteniĝi, se ne orde, almenaŭ kune, antaŭ la pordo de l' butiko.

«Sed, filetoj», de tie predikis la kapitano, «kion vi faraĉas ĉi tie? Hejmen, hejmen. Kie estas Dio-timo? Kion diros la reĝo nia sinjoro? Ni ne volas fari al vi malbonon; sed foriru hejmen. Kondutu saĝe! Kion diable vi volas fari ĉi tie, tiel amasigite? Nenion bonan, nek por animo, nek por korpo. Hejmen, hejmen».

Sed tiuj kiuj vidis la vizaĝon de la diranto, kaj aŭdis ties dirojn, eĉ se ili volus obei, vi diru kiamaniere do ili povus, tiel puŝate kaj urĝate de arieruloj⁵, siavice puŝataj de aliaj, kiel ondoj de ondoj kaj tiel plu ĝis la ekstremo de la amaso, kiu pli kaj pli densiĝis. Al la kapitano komencis manki spiro. «Puŝu reen, tiel ke mi ekspiru», li diris al la halebardistoj: «sed

⁵ arieruloj: malantaŭuloj.

difektu neniun. Ni provu eniri en la butikon; frapu la pordon; retenu la popolon».

«Reen! reen!» krias la halebardistoj, sin jêtante ĉiuj kune sur la unuajn, kaj repelante ilin per la halebardo-stangoj. Tiuj kriegas, retiriĝas laŭpove; ili frapas per dorsoj brustojn, per kubutoj ventrojn, per kalkanoj piedpintojn de l' arieruloj: okazas tia kunpremiĝo kaj kunpuŝiĝo, ke la starantaj meze pagus iom da mono por stari aliloke. Dume vakiĝis iom da spaco antaŭ la pordo: la kapitano frapas, refrapas, kriegas ke oni al li malfermu: la domanoj ekvidas el la fenestroj, kure desupras, malfermas; la kapitano eniras, vokas la halebardistojn, kiuj kun li enpenetras unu post alia; la lastaj tion faras retenante la amason per l' halebardoj. Kiam ĉiuj eniris, oni la pordon riglegas kaj denove trab-apogas; la kapitano rapide alsupras, kaj elŝovas la kapon tra fenestro. Hu, kia svarmado!

«Filetoj», li krias: multaj levas la kapon; «filetoj, iru hejmen. Ĝeneralan pardonon al ĉiuj, kiuj revenas hejmen».

«Panon! panon! malfermu! malfermu!» estis la vortoj plej distingeblaj en la horora kriado, kiun la amaso eligis responde.

«Prudenton, filetoj! ja gardu vin! vi ankoraŭ havas tempon. Ek, reiru, revenu hejmen. Da pano vi havos; sed ne ĉi tia estas la rimedo. He!... he! kion vi faraĉas tie sube! He! ĉe tiu pordo! Fi, fi! Mi vidas, mi vidas: prudenton! ja gardu vin! estas grava krimo. Tuj tuj venos mi mem. He! he! ĉesu per tiuj feraĵoj; malsupren tiuj manoj! Hontinde! Vi, la Milananoj, renomaj en la tuta mondo pro via bonkoreco! Aŭskultu, aŭskultu: ĉiam vi estis bonaj file'... Ha kanajlo!».

Tiun ĉi rapidan stilo-ŝanĝon kaŭzis ia ŝtono, kiu, elirinte el la manoj de unu el tiuj bonaj filetoj, atingis la kapitanan

frunton, ĉe l' maldekstra protuberanco⁶ de la metafizika profundaĵo⁷. «Kanajlo! kanajlo!» li plukriis, fermante rapidege la fenestron, kaj retiriĝante. Sed, kvankam li kriis per la tuta blovo de sia spir-tubo, ĉiuj liaj vortoj, bonaj kaj malbonaj, disvaporigis kaj vaniĝis mez-aere, tra la tempesto de l' krioj venantaj de sube. Koncerne tion, kion li diris ke li vidas, estis granda klopodado per ŝtonaĵoj kaj feraĵoj (la unuaj, kiujn ili sukcesis trovi surstrate), ĉe la pordo, por ĝin trarompi, kaj ĉe l' fenestroj, por elŝiri la fer-kradojn: kaj temis pri jam progresinta operaco.

Dume la butikaj mastroj kaj helplaboristoj, starantaj ĉe l' fenestroj de l' supraj etaĝoj, kun municio el ŝtonoj (supozeble ili malpavimis korton), kriegis kaj grimacis al la substarantoj, ke ili ĉesu; ili montris la ŝtonojn, gestante ke ili intencas ilin de-ĵeti. Vidinte ke tio estas nur tempo-perdo, ili efektive komencis ilin ĵetaĉi. Eĉ ne unu mistrafis, ĉar la kunpremiĝo estis tia, ke eĉ ne unu milio-grajno falus teren.

«Ha friponaĉoj! Ha kanajlaĉoj! Ĉu tian panon vi donas al la malriĉa popolo? Aj! Ho ve! Oj! Nu, nu!» oni kriis de sube. Pli ol unu homo estis aĉe aranĝita; kaj du knaboj mortigitaj. La furiozo pliigis la fortojn de l' popolamaso: oni trarompis la pordon, kaj deŝiris la ferkradojn; la torentego enpenetris tra ĉiuj aperturoj. La domanoj, vidante la aĉan sorton, eskapis en la subtegmenton: la kapitano, la halebardistoj, kaj kelkaj hejmanoj restis tie, buliĝinte en kaŝanguloj; aliaj, elirinte tra

⁶ *protuberanco*: anatomia elstaraĵo.

⁷ *metafizika profundaĵo*: ironia aludo al teorio, laŭ kiu en la homa cerbo la metafiziko (= rezonkapablo) loĝas interne de la maldekstra parto de la frunto: tiu anatomiaĵo, frapite per ŝtono, ŝanĝis la stilon de lia parolado...

lukoj⁸, rampis sur tegmentoj, kvazaŭ katoj.

Ĉe l' ekvido de la predo la konkerintoj forgesis la intencojn pri sangaj venĝoj. Ili sin ĵetas sur la pan-kestojn; la panon oni disrabas. Sed iuj kuras al la vendo-benke, frakasas la seruron, ekkaptas la mon-bovlojn⁹, deprenas man-plene, enpoŝigas kaj foriras ŝargite de moneroj, por reveni pli poste rabi panon, se da ĝi restos. La popolamaso disiras en la tenejojn. La sakojn oni kaptas, trenacas, renversas: iu metas sakon inter la krurojn, malligas ties aperturon, kaj forŝutas parton de faruno, por igi ties pezon portebla: alia, kriante: «atendu, atendu!» sin klinas por etendi antaŭtukon, naztukon, ĉapelon, por ricevi tian Dian abundon; tria kuras al knedujo, kaj prenas pecon de mola pasto, kiu longiĝas kaj eskapumas ĉiuflanken; alia, konkerinte kribro-sakon, ĝin portas levita; iro-reiro: viroj, virinoj, infanoj, puŝoj, repuŝoj, kriegoj, kaj blanka pulvoraĵo, kiu ĉie demetiĝas, ĉie leviĝas, ĉion vualas kaj malklarigas. Ekstere, amasa kunpremiĝo el du kontraŭaj procesioj, kiuj reciproke sin rompas kaj malhelpas: de elirantoj kun rabitaĵo, kaj de enirantoj por rabi.

Dum tiu bakejo estis tiel renversata, neniu alia en la urbo estis trankvila kaj sendanĝera. Sed ĉe neniu la popolo amasiĝis tiel multnombra, ke ĝi povus ĉion ajn entrepreni; iuloke la mastroj sukcesis kolekti helpo-fortojn, kaj staris defensive; aliloke, estante malmultaj, ili iel intertraktis: ili disdonis panon al la amasiĝantaj antaŭ la butikojn, kondiĉe ke ili foriros. Kaj tiuj foriris, ne tiom ĉar ili kontentis, kiom ĉar la halebardistoj kaj la sbiraro teniĝis ja distance de tiu terura Lambaston-bakejo, sed montris sin aliloke, en nombro sufiĉa por fortimigi

⁸ *lukoj*: speco de fenestroj en tegmento, por enlasi lumon.

⁹ *monbovlojn*: duonsferajn tasojn, kiujn butikistoj uzis kiel monujojn.

fiulojn ne tiom multnombrajn por estigi amason. Tiel la tumulto pli kaj pli kreskis ĉe tiu unua malfeliĉa bakejo; ĉar ĉiuj, kies manoj jukis fari bravaĵon, rapidis tien, kie la amikoj estis plej fortikaj, kaj senpuneco certis.

Tiaj estis la aferoj, kiam Renzo, jam krakmanĝinte sian panon, pluiris tra l' randkvartalo de l' Orienta Pordego, kaj ne konscie sin direktis ĝuste al la centro de l' tumulto. Li marŝis jen rapide jen malakcelate de la popolamaso, kaj marŝante li rigardis, kaj streĉis la orelojn, por ĉerpi el tiu konfuza parolzumado pli klaran sciigon pri la stato de la aferoj. Kaj jen proksimume la vortoj, kiujn li sukcesis kapti laŭlonge de l' vojo de li tramarŝita.

«Nun estas malkovrita», kriis unu «la fia trompaĉo de tiuj friponoj, kiuj diris ke estas nek pano, nek faruno, nek tritiko. Nun oni vidas la aferon klara kaj evidenta; kaj ili ne plu sukcesos trompaĉi nin. Vivu la abundo!». «Ja mi diras al vi, ke ĉio ĉi tute ne utilas», diris alia: «ĝi estas kiel truo en akvo; la situacio eĉ pliaĉiĝos, se oni ne faras konvenan justecon. La pano fariĝos malpli kara, sed oni en ĝin enmetos venenon, por mortigi la malriĉan popolon, kvazaŭ muŝojn. Oni jam diras, ke ni estas tro multaj; oni tion diris en la skabenara kunsido; kaj tion mi scias certe, ĉar mi ĝin aŭdis per miaj oreloj, ĉe unu mia kunulino, kiu estas amikino de parenco de manĝuj-lavisto de unu el tiuj senjoroj».

Ne ripetebajn vortojn diris alia, kun ŝaŭmo ĉe l' buŝo, tenante per mano ĉifonan naztukon sur la taŭzitaj kaj sangumitaj kapharoj. Kaj najbaro, kvazaŭ por lin konsoli, al li reeĥis.

«Spacon, spacan, sinjoroj, bonvole; lasu pasi malriĉan familiestron, kiu portas nutraĵon al kvin filetoj». Tiel diris

homo venanta ŝanceliĝe sub granda farunsako; kaj ĉiu strebis retiriĝi, por havigi al li spacon.

«Kio pri mi?» diris alia, preskaŭ mallaŭte, al kunulo: «Mi forŝteliĝas. Mi estas mondo-sperta, kaj scias kiel iras ĉi-aferoj. Ĉi-senspertaj anseridoj, kiuj nune tiom multe bruaĉas, morgaŭ aŭ postmorgaŭ restos hejme timoplene. Mi jam vidis iajn mienaĉojn, iajn honestulojn, kiuj rondiras ŝajnigante indiferentecon, kaj rimarkas, kiu ĉeestas kaj kiu forestas: kaj kiam ĉio estos finita, oni finkalkulas, kaj kiun ĝi trafas, tiun ĝi trafas».

«Protektanto de l' bakistoj», kriis sonora voĉo, kiu atentigis Renzon, «estas la proviantestro».

«Ĉiuj kanajloj», diris najbaro.

«Jes; sed la ĉefo estas li», rebatis la unua.

La proviantestro, elektite ĉiujare far la guberniestro elinter ses nobeloj proponitaj de la Konsilio de l' dekestroj, estis prezidanto de tiu Konsilio, kaj de la proviant-tribunalo. Ĉi-lasto konsistis el dek du nobeloj, kaj estis interalie komisiita pri la nutraĵ-provizado. La okupanto tian postenon estis, en tempo de malsatego kaj malklereco, nepre taksata kulpa pri l' malfeliĉoj; krom se li farus tion, kion faris Ferrer: aferon, kiu ne estis en liaj rajtoj, eĉ se ĝi estus en liaj ideoj.

«Kanajloj!» elkriis alia: «ĉu eblas fari pli aĉe? Oni eĉ diris, ke la grand-kanceliero estas stultiĝinta oldulo, por igi lin ne kredinda, kaj regi ili solaj. Necesus fari grandan kaĝon, kaj ilin enmeti kaj nutri per vicioj kaj lolo¹⁰, kiel ili intencis trakti nin».

«Pano, ĉu?» diris iu, kiu strebis foriri rapide: «unu-

¹⁰ *vicioj kaj lolo*: vegetaĵoj, per kiuj oni nutris kokojn.

funtaj¹¹ ŝtonoj, ŝtonoj ĉi-tiaj, falantaj kvazaŭ hajlo. Kaj kia ripo-premado! Mi malpacienças sidi hejme».

Renzo, inter ĉi tiaj paroloj, kiuj, mi ne scias, ĉu pli multe lin informis aŭ konsternis; kaj inter puŝegoj, fine atingis tiun bakejon. La popolamaso jam rimarkinde maldensiĝis, tiel ke li povis kontempli la aĉan, ĵusan renversegon. La muroj malstukitaj kaj difektitaj per ŝtonoj, per brikoj, la fenestroj elfostigitaj, la pordo ruinigita.

– Sed tio ĉi ne estas bona afero, – diris Renzo en si mem; – se oni tiele aranĝaĉas ĉiujn bakejojn, kie do ili intencas fari panon? Ĉu en putoj? –

De temp' al tempo eliris de la butiko kelkiu, portante pecon de pan-kesto, aŭ de knedujo, aŭ de kribrilo, stangon de knedilo, benkon, pan-korbon, konto-libron: entute ion el tiu kompatinda bakejo; kaj kriante: «spacon! spacon!» pasis tra la popolamaso. Ĉiuj ĉi homoj survojiĝis samdirekten, evidente al interkonsentita loko. – Kia nova historio ĝi estas? – ekpensis denove Renzo; kaj li post-sekvis iun, kiu, farinte faskon el pecigitaj tabuloj kaj splitoj, ĝin al si metis surŝultre, ekirante kiel la aliaj tra la strato laŭ la norda flanko de la katedralo, kaj nomita el la ŝtupoj tiam estantaj kaj antaŭ nelonge forigitaj. La scivolo rigardi la eventojn ne evitigis, ke la montarano, ĉe l' vido de la giganta konstruaĵo, haltetis gapante supren. Poste li rapidis atingi tiun, kiun li elektis gvidanto; li turniĝis laŭ la angulo, ekrigardis ankaŭ la fasadon de la katedralo, tiutempe grandparte krudan, kaj foran de fin-ornamado; kaj li plu sekvis tiun homon, kiu aliris al la centro de la placo. Ju pli antaŭe, des pli densa estis la popolo, sed al la portanto oni vojon malfermis; li fendis la ondon de la popolo, kaj Renzo, daŭre al

¹¹ *unufuntaj*: funto estis mezurunuo de pezo = ĉ. duonkilogramo.

li alpremita, atingis kun li la centron de la popolamaso. Tie kuŝis libera spaco, kaj meze de ĝi amaso da braĝoj, restaĵoj de l' supre menciitaj laboriloj. Ĉirkaŭe, manaj kaj piedaj klakfrapoj, bruego el mil triumfaj kaj sakraj krioj.

La viro kun la fasko ĵetis ĝin sur tiun amason; alia, per duon-brulinta ŝpato-stumpo, pliardigas la fajron: fumo pliiĝas kaj densiĝas; flamo revekiĝas; kun ĝi la krioj leviĝas pli laŭtaj. «Vivu abundo! Mortu malsatigantoj! Mortu malsatego! Mortaĉu la Provianto! Mortaĉu la komisiono! Vivu la pano!». Verdire, detruo de kribriroj kaj kneduroj, ruinigo de bakejoj kaj perfortaĉo al bakistoj, ne estas plej rektaj rimedoj por vivu-igi la panon, sed ĉi tio estas unu el la metafizikaj subtilaĵoj, kiujn la popolmulto ne atingas. Foje tamen oni tuj ĝin intuicias, eĉ ne estante granda metafizikisto, dum oni ankoraŭ estas novico pri la demando; nur pli poste, per troa preparolo kaj priaŭdo, oni fariĝos malkapabla eĉ kompreneti ĝin. Fakte tiu penso venis en la kapon de Renzo jam dekomence, kiel ni vidis, kaj ĉiumomente ĝi revenis. Cetere li tenis tiun penson sekreta, ĉar, inter tiom da vizaĝoj, neniu estis, kiu ŝajnis diri: frato, se mi eraras, korektu min, kaj tion mi ŝategos.

Jam denove la flamo estingiĝis; neniu plu aperis kun brulmaterialo, kaj la homoj komencis enui; kaj jen disvastiĝas onidiro, ke ĉe Cordusio (placeto aŭ kruciĝejo ne multe distanca de tie), oni eksieĝis bakejon. Ofte, en tiaj cirkonstancoj, anonco pri afero estigas la aferon mem. Kune kun la onidiro, tra la popolamaso disvastiĝis emo alkuri tien: «Mi iras; ĉu vi iras? Mi venas; ni iru», aŭdiĝis ĉie. La kunpremita amaso rompiĝas, kaj fariĝas procesio. Renzo postrestis preskaŭ senmova, krom kiom lin kuntrenis la

popoltorento; kaj dume li konsiliĝis en sia koro, ĉu eliri el la tumulto, kaj reveni al la monakejo serĉi patron Bonaventura, aŭ iri spekti ankaŭ ĉi-alian aferon. Scivolo denove supervenkis. Tamen li decidis ne eniĝi en la denson de la interpuŝo, por ne difekti siajn ostojn aŭ riski eĉ pli aĉe; sed resti iom distance, observante. Kaj kiam li troviĝis jam iom maldense, li elpoŝigis la duan panon, kaj ekmordante ĝin, li ekmarŝis ĉe l' vosto de l' tumulto armeo.

Ĉi lasta, el la placo jam eniris en la kurtan mallarĝan straton de l' Malnova Fiŝejo, kaj de tie, tra tiu oblikva arkaĵo, en la placon de l' Komercistoj. Kaj tie nur malmultaj, pasante antaŭ la niĉo, kiu tranĉas la mezon de la loĝio de la konstruaĵo tiam nomata Kolegio de l' Doktoroj, evitis rigardi la statuegon, kiu tie imponis: tiun seriozan, severan, sulkbrovan, kaj mi ne diras sufiĉe, vizaĝon de Don Filippo la 2-a, kiu, eĉ el la marmoro inspiris mi ne scias kian respekton, kaj, kun tiu etendita brako, ŝajnis dironta: nun venas mi mem, kanajlaro.

Tiu statuo ne plu staras tie, pro kurioza okazaĵo. Ĉirkaŭ cent sepdek jaroj post la eventoj ĉi tie rakontataj, iun tagon oni al ĝi ŝanĝis la kapon, deprenis la sceptron¹² kaj anstataŭigis ĝin per ponardo¹³: kaj la statuon oni ali-nomis Marko Bruto¹⁴. Tiel aranĝite, ĝi restis dum eble du jaroj; sed iun matenon iuj homoj, kiuj ne simpatiis al Marko Bruto, kaj certe eĉ sentis sekretan rankoron kontraŭ li, ĵetis ŝnuron ĉirkaŭ la statuon, detiris ĝin, faris al ĝi cent mistraktojn; kaj stumpiginte kaj

¹² *sceptron*: komandan bastonon de suvereno.

¹³ *ponardo*: mallonga pikarmilo.

¹⁴ *Marko Bruto*: romiano, unu el la murdintoj de Julio Cezaro (j. 44-an a. K.). Dum la Franca Revolucio oni gloris lin kiel heroon de batalado kontraŭ tiraneco; sed post la Revolucio lia populareco finiĝis.

farinte ĝin senforma torso¹⁵, ili ĝin trenaciis, kun eksterorbitaj okuloj kaj eksterbuŝaj langoj, tra la stratoj, kaj kiam ili estis tute lacaj, ili forrulis ĝin, mi ne scias kien. Kiu tion prognozus al Andrea Biffi, kiam li skulptis ĝin!

El la placo de l' Komercistoj la fiularo tra la alia arkaĵo eniĝis en la straton de l' Fustenistoj, kaj de tie disiris en Cordusion. Tien alvenante, ĉiu ekrigardis al la indikita bakejo. Sed anstataŭ trovi la atenditan amason da jam laborantaj amikoj, ili vidis nur kelke da homoj starantaj kvazaŭ hezite kelkdistance de la butikoj, kiu estis fermita, kaj ĉe l' fenestroj armitojn, kiuj sin montris pretaj defendi sin. Ĉe tiu ekvido, unua miris, dua sakris, tria ridis; aliaj sin returnis, por informi la laŭvicajn alvenantojn, aliaj ekhaltis, aliaj volus iri returnen, aliaj diris: «antaŭen, antaŭen». Okazis puŝado kaj bremsado, kvazaŭ stagnado, hezito, konfuza zumado el kontraŭstaroj kaj konsiliĝoj. Ĉe tio, meze de la popolamaso eksplodis damnita onidiro: «ĉi-apude staras la domo de l' proviantestro: tien ni iru fari justecon kaj rabon!». Ĝi ŝajnis rememoro pri iama interkonsento, pli ol akcepto de nova propono. «Al la proviantestro! al la proviantestro!» estas la ununura aŭdata krio. La tuta amaso moviĝas kune, direkte al la strato, kie staris la domo menciita en tiel maloportuna momento.

¹⁵ torso: homa trunko, sen kapo nek brakoj.

XIII

La malfeliĉa proviantestro estis tiumomente faranta acidan kaj penan digestaĉon, post tagmanĝo maĉita¹ sen apetito kaj sen freŝa pano; kaj tute suspense li atendis, kiel do finiĝos tiu tempestego, tute ne suspektante, ke ĝi falos tiel terure ĝuste sur lin mem. Kelke da honestuloj algalopis antaŭ la homamaso, por lin averti pri la tuja minaco. La servistoj, altirite per la bruo al la pordego, rigardis konsternite la straton laŭ la direkto, de kie la bruo proksimiĝas. Dum ili aŭskultas la averton, ili jam vidas aperi la avangardon; oni plej rapidege portas la avizon al la mastro; dum ĉi-lastas pensas fuĝi, kaj kiel fuĝi, alia homo venas diri, ke tio ne plu eblas. La servistoj havas apenaŭ sufiĉe da tempo por fermi la pordon. Ili metas la pordo-stangon, almetas apog-trabojn, kuras fermi la fenestrojn, kiel kiam oni vidas proksimiĝi nigran veteraĉon kaj oni atendas hajlon de moment' al momento. La kreskanta hurlado, venante desupre kvazaŭ tondro, sonoras en la malplena korto; ĉiu truo de la domo resonegas: kaj en la vasta kaj konfuza bruado aŭdiĝas fortaj kaj densaj ŝton-batoj kontraŭ la pordon.

«La proviantestron! La tiranon! La malsatiganton! Ni volas lin! Aŭ vivan aŭ mortan!».

La mizerulo vagis de ĉambro al ĉambro, pala, senspira, frapante manon kontraŭ mano, sin rekomendante al Dio kaj al siaj servistoj, ke ili rezistu firme, kaj eltrovu artifikon por lin eskapigi. Sed kiel, tra kie? Li alsupris al la subtegmento; el fendeto li rigardis angor-plene la straton, kaj li vidis ĝin tute plena de furiozuloj; li aŭdis la voĉojn postulantaj lian morton; kaj, plej konsternite, li retiriĝis kaj iris serĉi kiel eble plej

¹ *maĉita*: manĝe dispremita-muelita per dentoj.

sekuran kaj foran kaŝejon. Tie li buliĝis kaj atentis, atentis, ĉu tiu damnita bruado malpliĝas, ĉu la tumulto kvietiĝas iomete; sed male, aŭdante la muĝadon leviĝi pli kaj pli feroce kaj brua, kaj la frapojn duobligi, li, trafite per nova kor-batego, al si ŝtopis rapide la orelojn. Poste, kvazaŭ freneza, kunpremante la dentojn, kaj faltante la vizaĝon, li etendis la brakojn kaj puŝ-premis la pugnoj, kvazaŭ li volus teni la pordon senmova... Cetere ne scieblas, kion precize li faris, ĉar tie li sidis sola; kaj la historio estas devigita diveni. Bonŝance, ke al tio ĝi estas kutimiĝinta.

Renzo ĉi-foje troviĝis en la denso de la tumulto, tute ne alportite de la inundego, sed sin enŝovinte libervole. Ĉe tiu unua propono verŝi sangon, li sentis la sian tute boli; koncerne prirabon, li ne sciis, ĉu tiukaze ĝi estas bona aŭ malbona; sed la ideo pri murdo kaŭzis en li veran kaj tujan hororon. Kaj kvankam, pro l' damnita cedemo de l' pasiaj animoj al la pasia asertado de l' plimulto, li estis tute konvinkita ke la proviantestro vere estas ĉefkaŭzo de l' malsato kaj malamiko de l' malriĉuloj; tamen, aŭdinte hazarde, ĉe l' ekiro de l' popolamaso, iujn vortojn esprimantajn intencon fari ĉian klopodon por savi lin, li tuj ekintencis kunhelpi al tia faro; kaj tiuintence li sin enŝovis preskaŭ ĝis tiu dom-pordo, kiun oni cent-maniere turmentadis. Kelkaj per ŝtonetoj batis la najlojn de la seruro, por malnajli ĝin; aliaj klopodis labori pli racie per stangoj kaj skulptiloj kaj marteloj; triaj per ŝtonoj, per senpintaj tranĉiloj, per najloj, per bastonoj, per ungoj ne havante alion, malstukis kaj malkompaktigis la muron, kaj klopodis eligi la brikojn kaj estigi breĉon. Tiuj kiuj ne povis helpi, instigis per krioj; sed samtempe, tiel kunpremite, ili pli multe malhelpis la laboron jam malhelpatan de la senorda

konkuro de l' laborantoj; ĉar, dank' al Dio, foje okazas ankaŭ ĉe l' malbonaj faroj afero tro ofta ĉe la bonaj: tio estas, ke la plej fervoraj favorantoj fariĝas faktaj malhelpantoj.

La magistratanoj, avertite kiel unuaj pri l' okazantaĵo, tuj sendis peti helpon ĉe la komandanto de l' kastelo tiutempe nomata kastelo de Giovia-pordego; la komandanto sendis kelke da soldatoj. Sed inter la averto, kaj la ordono, kaj la kolektiĝo, kaj la ekmarŝo, kaj la marŝado mem, ili alvenis kiam la domo jam estis vaste sieĝata; kaj ili haltis for de ĝi, rande de la popolamaso. La oficiro, kiu komandis ilin, ne sciis kion decidi. Tie staris nur ia, permesu ke mi diru, kunmetaĵo el homoj el diversaj aĝo kaj sekso, kiuj rigardadis. Al la ordonegoj disiri kaj lasi liberan spacon, ili respondadis per longa obtuza murmuro; neniu moviĝis. Pafi kontraŭ tiun homkolektaĉon ŝajnis al la oficiro afero ne nur kruela, sed eĉ danĝera; afero kiu, ofendante la malpli timindajn, incitegus la multajn perfortulojn; kaj cetere tian instrukcion li ne havis. Pli bona solvo eble estus fendi tiun unuan amason, renversi ĝin dekstren kaj malen, kaj avanci por porti batalon kontraŭ la faktajn batalantojn; sed kiel tion efektivigi, jen estis la problemo. Kiu sciis, ĉu la soldatoj sukcesos avanci unuece kaj orde? Se ili, anstataŭ rompi la homamason, malkuniĝus tra ĝi, inciteginte ĝin, ili mem troviĝus sub ties arbitro. La nedecidemo de l' komandanto kaj la senmoveco de l' soldatoj prave aŭ malprave aspektis kiel timo. La homoj kiuj troviĝis al ili proksimaj, nur rigardadis ilian vizaĝon kun mieno, kvazaŭ ili dirus: mi prifajfas vin; la starantoj iom pli fore ne sin detenis provoki ilin per grimacoj, per insultmokaj krioj; pli fore nur malmultaj konsciis aŭ zorgis, ke ili ĉeestas; la rompantoj plu malmasonis, sen alia zorgo krom baldaŭa

finsukceso de tiu faro; la spektantoj ne ĉesis ilin instigi per kriegoj.

Distingiĝis inter ili, kaj estis li mem spektaklo, fia oldulo, kiu malfermegante du kavajn kaj fajrajn okulojn, kuntirante la faltojn por ridaĉo el diableca plezuriĝo, kun la manoj levitaj super la abomeninda blank-hararo, alte svingis martelon, ŝnuron kaj kvar najlegojn, per kiuj li diris, ke li intencas pendumi la proviantestron je unu pordo-klapo, post kiam li estos murdita.

«Fi-honte!» elbuŝigis Renzo, horrorinte ĉe tiuj vortoj kaj ĉe l' vido de pluraj aliaj vizaĝoj esprimantaj aprobon pri ili, kaj aliflanke kuraĝigite vidante aliajn, kiuj, kvankam mutaj, montris lian saman hororon. «Hontinde! Ĉu ni volas uzurpi la metion de l' ekzekutisto? Ĉu murdi kristanon? Kiel vi volas, ke Dio donu al ni panon, se ni faras tiajn kruelaĵojn? Ne panon, sed fulmojn li al ni sendos!». «Ha hundaĉo! Ha perfidulo de l' patrujo!» ekkriis, sin turnante al Renzo kun mieno de demonhavanto, unu el la homoj, kiuj tra l' bruado sukcesis aŭdi tiujn sanktajn vortojn. «Atendu, atendu! Li estas servisto de l' proviantestro, kamuflita kiel kamparano: spiono li estas: batu, batu!». Cent voĉoj disvastiĝas ĉirkaŭen. «Kio estas? kie estas? kiu estas? Servisto de l' proviantestro. Spiono. La proviantestro kamuflita kiel kampulo, kiu forkuras. Kie li estas? Kie li estas? batu, batu!». Renzo mutiĝas, naniĝas, volus malaperi; kelkaj najbaroj lin alprenas en sian mezon, kaj per laŭtaj, diversaj krioj klopodas konfuzi la malamikajn, murdemajn voĉojn. Sed pli ol ĉio helpis lin la krio: «Spacon, spacon!», kiu aŭdiĝis tute apude: «spacon! jen helpilo: spacon: ho he!». Kio do estis? Estis longa ligna ŝtupetaro, kiun kelke da homoj alportis, por ĝin apogi al la

domo, kaj per ĝi eniri tra fenestro. Sed bonŝance tiu rimedo, kiu igus la aferon facila, estis ĝi mem malfacile funkciigebla. La portantoj, ĉe ambaŭ ekstremoj, kaj ambaŭflanke de la sieĝmaŝino, puŝate, malhelpate, kaj disigate per la premiĝo, sin movis onde: unu homo, kun la kapo inter du ŝtupetoj kaj kun la du fostoj surŝultre, premate kvazaŭ sub skuata jugo, vemuĝis; ekpuŝo disigis alian disde la ŝargajaĵo; la ŝtupetaro, delasite, bataĉis ŝultrojn, brakojn, ripojn: konjektu, kion eldiris la homoj, al kiuj tiuj membroj apartenis. Aliaj levas per la manoj la mortan pezaĵon, sin subigas kaj surprenas ĝin, kriante: «kuraĝe! ek!». La fatala maŝino avancis plumpe-salte kaj serpentume. Ĝi alvenis ĝustatempe por distri kaj misordigi la malamikojn de Renzo, kiu elprofitis la konfuzon estiĝintan en la konfuzo; kaj, komence tute kviete, pliposte umante kiel eble plejforte per la kubutoj, li foriĝis de tiu loko, kie la aero ne estis por li konvena, intencante ankaŭ forlasi plej baldaŭ tiun tutan tumulton, kaj vere iri trafi aŭ atendi patron Bonaventura.

Subite, ek de unu rando, eksterordinara movo etendiĝas tra la homamaso, onidiro disvastiĝas, avancis de buŝo al buŝo: «Ferrer! Ferrer!». Miro, ĝojo, kolero, favoro, abomeno eksplodas ĉie, kien alvenas tiu nomo; unu ĝin krias, dua volus ĝin sufoki; unu asertas, alia neas, unu benas, dua blasfemas.

«Ĉeestas Ferrer! – Tio ne veras, ne veras! – Jes, jes; vivu Ferrer! Kiu igis la panon malkara. – Ne, ne! – Li ĉeestas, ĉeestas sur kaleŝo. – Kiom gravas? kio lin koncernas? neniun ni volas! – Ferrer! vivu Ferrer! la amiko de l' malriĉuloj! Li venas por konduki la proviantestron en malliberejon. – Ne, ne; ni mem volas fari justecon: reen, reen! – Jes, jes: Ferrer! venu Ferrer! la proviantestron en malliberejon!». Kaj ĉiuj, leviĝinte

piedpinte, sin turnas, por rigardi al la direkto, kie anonciĝis la neatendita alveno. Ĉiuj, leviĝinte, vidis nek pli nek malpli, ol se ili starus tutplande; malgraŭ tio, ĉiuj levis sin.

Fakte, al la homamaso ekstremo kontraŭa al tiu, kie staris la soldatoj, alveturis kaleŝe Antonio Ferrer, la grand-kanceliero, kiu, verŝajne pro konscienc-riproĉo, ke li mem, per siaj fuŝaĵoj kaj obstino, estigis kaŭzon aŭ almenaŭ oportunon por tiu ribelo, nun venis klopodi kvietigi ĝin, kaj malhelpi almenaŭ ties plej terurajn kaj neripareblajn efikojn: li venis bone elspezi la malbone aĉetitan popularecon.

En la popol-tumulto ĉiam ĉeestas da homoj, kiuj, pro pasia fajro, aŭ pro fanatika konvinko, aŭ krimea plano, aŭ damnita renversemo, faras ĉion eblan, por pliaĉigi la aferojn; proponas aŭ favoras plej malhumanajn konsilojn; blovas en fajron, ĉiufoje kiam ĝi komencas malvigliĝi; laŭ ili, nenio iam troas; ili volas, ke la tumulto havu nek finon, nek limon. Sed kompanse ĉiam ĉeestas ankaŭ da aliaj homoj, kiuj, kun samaj fervoro kaj persisto, klopodas efiki la malon: iuj pro amikeco aŭ partiuo favore al la minacatoj, aliaj sen alia impulso krom pia kaj spontana abomeno kontraŭ sango kaj kruelaj faroj. La Ĉielo ilin benu. En ambaŭ opoziciaj partioj, eĉ sen antaŭkonsentoj, la unueco de l' volo estigas tujan konsenton pri l' faroj. La granda popolamaso, kvazaŭ materialo de la tumulto, konsistas el hazarda miksaĵo de homoj, kiuj, pli-malpli, laŭ nedifinitaj gradoj, apartenas al unu aŭ al alia el la du ekstremoj: iom febraj, iom ruzaj, iom inklinaj al justeco, laŭ sia propra justec-koncepto, iom avidaj spekti enormaĵon, pretaj al kruelo kaj kompto, al abomeno kaj adoro, laŭ tio, ke aktualas la oportuno plene gustumi unu el la du sentoj; ĉiumomente avidaj ekscii, ekkredi ion enorman, avidaj hurli,

aplaŭdi iun ajn, aŭ kriegi kontraŭ li. Vivu kaj mortu, estas la du vortoj, kiujn ili eligas plej volonte; kaj la homo, kiu sukcesus ilin konvinki, ke iu ne meritas dishakiĝon, ne bezonus pli multe da vortoj, por ilin persvadi, ke tiu meritas triumfan disportiĝon: aktoroj, spektantoj, perantoj, malhelpantoj laŭ la vento; pretaj eĉ silenti, se ili ne plu aŭdas kriojn por ripeti; pretaj ĉesi, kiam ne plu estas instigantoj; disiri, kiam pluraj konkordaj kaj senkontraŭdiraj voĉoj diras: ni foriru; kaj rehejmiĝi demandante unu la alian: kio okazis? Sed ĉar tiu amaso, havante plej grandan forton, povas disponigi ĝin laŭvole al unu aŭ al alia, tial ĉiu el la du aktivaj partioj eluzas ĉian rimedon, por ĝin altiri siaflanken kaj ĝin ekregi: kvazaŭ du malamikaj animoj interbatalantaj por eniri en tiun korpegon, kaj ĝin movi. Ili konkuras dissemi onidirojn plej taŭgajn por eksciti pasiojn kaj direkti movojn favore al unu aŭ al alia intenco; por pli taŭge eltrovi novaĵojn, kiuj denove akriegas indignojn aŭ mildigas ilin, revigligas esperojn aŭ terurojn; por inventi la sloganon, kiu ripetote de l' plimulto kaj pli laŭte, esprimu, atestu kaj samtempe estigu la majoritatan voĉdonon por unu aŭ alia partio.

Ĉi-tuta babilado estas farita por diri ke, en la interbatalo de l' du partioj konkurantaj por gajni la voĉdonon de la popolo amasiĝinta ĉe la domo de la proviantestro, la apero de Antonio Ferrer preskaŭ subite havigis grandan avantaĝon al la humaneca partio, kiu estis evidente malvenka kaj, se tiu helpo eĉ iomete pli malfruus, ne plu havus forton nek motivon por batali. Tiu viro estis tre ŝatata de la popolo, pro la takso, de li elpensita, tiel favora al aĉetantoj, kaj pro lia heroeca rezisto al ĉia kontraŭrezono. La animoj, jam favoraj, eĉ pli multe enamiĝis nun, pro la aŭdaca fidemo de la oldulo, kiu, sen

gardistoj, sen pompo, tiel venas trafi, alfronti la incititan kaj tumultan popolamason. Kaj mirinde efektis la onidiro ke li venas por konduki la proviantestron en malliberejon: tiel la popola furiozo, kiu, se alfronti ĝin per krudaj manieroj kaj nenion cedante, eĉ pli akre senkateniĝus, nun, per tiu promeso de kontentigo, per tiu enbuŝigita osto, iom kvietiĝis kaj cedis al aliaj, malaj sentoj, estiĝantaj en multe da animoj.

La pac-partianoj, reakirinte spiradon, helpis al Ferrer centmaniere: la plej proksimaj, instigante kaj reinstigante per sia ekzemplo la publikan aplaŭdon, kaj samtempe klopodante repeli la popolon, por havigi vojon al la kaleŝo; la aliaj aplaŭdante, ripetante kaj transdirante liajn vortojn, aŭ vortojn kiel eble plej bonajn, kiujn ili imagis ke li povus diri, akre kontraŭdirante la obstinajn furiozulojn, kaj turnante kontraŭ ĉi-lastajn la novan pasion de la malkonstanta homkolekto. «Kiu do ne volas, ke oni krii: vivu Ferrer? Ĉu vi ne volus, ke la pano estu malkara? Ja kanajloj ne volas kristanecan justecon: kaj ne mankas homoj, kiuj kriaĉas pli ol la aliaj, por eskapigi la proviantestron. En malliberejon la proviantestron! Vivu Ferrer! Spacon por Ferrer!». Kaj dum pli kaj pli kreskis tiuj kiuj parolis ĉi tiel, proporcie malaltiĝis la aroganteco de la kontraŭa partio; tiel ke la unuaj el proklamado pasis al farado, manbatante tiujn kiuj ankoraŭ malmasonis, repuŝante ilin, forŝirante el ties ungegoj iliajn laborilaĉojn. Ĉi-lastaj koler-vibris, eĉ minacis, klopodis reagi; sed la sang-avida partio estis malvenka. La krio, kiu superregis, estis: malliberejon, justecon, Ferrer! Post iom da rezisto, la perfortuloj estis repelitaj: la aliaj okupis la pordegon, ĉu por ĝin defendi kontraŭ novaj atakoj, ĉu por disponigi al Ferrer la enirejon; kaj kelkiu el ili, en-kriante al la domanoj (da fendoj ne mankis),

ilin avizis ke alvenas helpo, kaj ke ili tenu la proviantestron preta, «por tuj konduki lin... en malliberejon: hm... ĉu komprenite?». «Ĉu li estas tiu Ferrer, kiu helpas fari kriaĵojn?» demandis al nova najbaro nia Renzo, kiu rememoris la subskribon *vidit Ferrer*, kiun la advokato al li kriis ĉe l' orelo, al li montrante ĝin sub tiu tia kriaĵo.

«Jes ja: la grand-kanceliero», oni al li respondis.

«Li estas honestulo, ĉu ne?». «Kaj kia honestulo! Li estas tiu, kiu igis la panon malkara; kaj la aliaj ne volis; nun li venas konduki en malliberejon la proviantestron, kiu faris maljustajn aferojn».

Superfluas diri, ke Renzo senprokraste partianiĝis al Ferrer. Li volis iri senpere al li renkonte: la afero ne estis facila; sed per siaj montaraj puŝegoj kaj kubut-batoj, li sukcesis tratabi al si vojon, kaj atingi la unuan vicon, ĝuste flanke de l' kaleŝo.

Ĉi-lastaj jam penetris en la popolamason; kaj tiumomente ĝi haltis, pro unu el la malhelpoj neeviteblaj kaj oftaj en tiuspeca veturado. La olda Ferrer prezentis, jen ĉe unu, jen ĉe alia kaleŝ-fenestro, tute humilan, tute ridetan, tute afablan vizaĝon, kian li kutime rezervis nur por sinprezento antaŭ reĝo Don Filipo la 4-a; sed nun li estis devigita ĝin malŝpari ankaŭ ĉi-okaze. Li ankaŭ parolis; sed la bruado kaj zumado de tiom da voĉoj, kaj eĉ la vivu-krioj al li adresataj, igis liajn dirojn aŭdeblaj tre malmulte kaj al tre malmultaj. Li do sin helpis per gestoj, jen metante la fingro-pintojn al la lipoj, por kapti kison, kiun la manoj, tuj disaj, disdonis dekstren kaj malen, kiel dankon pro la publika korfavoro; jen ilin etendante kaj malrapide movante ekster fenestro, por peti iom da spaco; jen mallevante ilin bontonece, por iom da silento peti. Kiam iom

da silento estis elpetita, la plej proksimaj aŭdis kaj ripetis liajn vortojn: «panon, abundon; mi venas fari justecon; iom da spaco, bonvolu». Poste, impresite kaj kvazaŭ sufokite de la bruado de tiom da voĉoj, de l' vido de tiom da densaj vizaĝoj, da lin rigardantaj okuloj, li momente retiriĝis, ŝveligis la vangojn, eligis granda blovon, kaj diris en si mem: – *Por mi vida, que de gente!*² –

«Vivu Ferrer! Vi ne timu. Vi estas honestulo. Panon, panon!». «Jes, panon, panon», respondis Ferrer: «abundon; mi mem tion promesas», kaj li metis la manon surbrusten³.

«Iom da spaco», li tuj aldonis: «mi venas konduki lin en malliberejon, por al li doni ĝustan, merititan punon», kaj li aldonis mallaŭte: «*si es culpable*⁴». Kaj poste, sin klinante antaŭen al la koĉero, li diris haste: «*Adelante, Pedro, si puedes*⁵».

Ankaŭ la koĉero ridetis al la homamaso, kun amoplena ĝentileco, kvazaŭ li estus granda gravulo; kaj kun neeldirebla bontoneco li tute kviete svingetis la skurĝon dekstren kaj malen, por peti la ĝenajn najbarojn iom kuntiriĝi kaj retiriĝi. «Bonvolu», diris ankaŭ li mem, «miaj sinjoroj, iom da spaco, iomete; apenaŭ sufiĉe por pasi».

Dumtempe la plej aktivaj bonvoluloj klopodis havigi la tiel ĝentile petitan spacon. Iuj antaŭ la ĉevaloj retroirigis la homojn per bonaj vortoj, per meto de manoj sur brustojn, per mildetaj puŝetoj: «Nu, tien; iom da spaco, sinjoroj»; aliaj faris

² *Por mi vida, que de gente!* = Pro mia vivo, kiom da popolo! Ferrer kun publikaj itallingvaj eldiroj miksas privatajn komentojn hispane.

³ *la manon surbrusten*: promes-esprime.

⁴ *si es culpable* = se li kulpas

⁵ *Adelante, Pedro, si puedes* = Antaŭen, Pedro, se vi povas.

la samon ambaŭflanke de la kaleŝo, por ke ĝi pasu ne subradigante piedojn, nek kontuzante nazojn; kio, krom damaĝi personojn, elmetus al granda risko la kulminan popularecon de Antonio Ferrer.

Renzo, kontemplinte kelkmomente tiun dignan multaĝulon, iom perturbitan pro l' ĉagreno, pezigitan de laciĝo, sed fervorigitan de zorgo, ornamitan, se tiel diri, de la espero liberigi homon el morto-angoroj, Renzo, mi diras, rezignis ĉian intencon foriri; kaj li decidis helpi al Ferrer, kaj ne forlasi lin, ĝis la celo estos atingita. Tuj dirite, tuj farite: li ekklopodis, kune kun la aliaj, al li trabati vojon; kaj li certe ne apartenis al malplej aktivaj. La vojo trabatiĝis: «venu senĝene», diris al la koĉero pluraj homoj, retiriĝante aŭ irante antaŭen, por plu trabati vojon. «*Adelante, presto, con juicio*⁶», al li diris ankaŭ la mastro; kaj la kaleŝo ekruliĝis. Ferrer, inter la salutoj, kiujn li malŝpare disdonis amase al la publiko, rezervis aparte kelke da ili por dankesprimo, kun aluda rideto, al tiuj kiujn li vidis klopodi por li: kaj el tiaj ridetoj pli ol unu trafis Renzon, kiu verdire ilin meritis kaj tiutage servis al la grand-kanceliero pli bone ol kiom scipovus la plej lerta el liaj sekretarioj. Al la juna montarano, ravita de tiu bontoneco, preskaŭ ŝajnis ke li amikiĝis kun Antonio Ferrer.

La kaleŝo, ekirinte, plu veturis pli malpli lante, kaj ne sen pluaj haltetoj. La vojo eble ne longis pli ol unu pafodistanco; sed, koncerne la tempon por ĝin traveturi, ĝi povus ŝajni vojaĝeto, eĉ al homo ne havanta la sanktan urĝon de Ferrer. La homamaso moviĝis, antaŭ kaj malantaŭ, dekstre kaj maldekstre de la kaleŝo, kvazaŭ ondegoj ĉirkaŭ ŝipo veturanta kulmine de tempestego. Sed la bruego estis pli akuta,

⁶ *Adelante, presto, con juicio* = Antaŭen, rapide, kun prudento.

misagorda kaj surdiga ol tiu de tempestego. Ferrer, elrigardante jen de unu, jen de la alia flanko; kaj mienante kaj gestante samtempe, klopodis ion kompreneti, por konformigi la respondojn laŭbezzone; li volis laŭeble iom dialogi kun tiu amikaro; sed la afero estis malfacila: eble la plej malfacila lin trafinta dum lia multjara grand-kancelierado. Tamen de temp' al tempo unu vorto aŭ eĉ tuta frazo, ripetata de homrondeto ĉe lia paso, al li aŭdeblis same kiel, en senfina kraketado de art-fajraĵo, aŭdeblas pli forte eksplodo de unu raketo. Kaj, jen strebante respondi kontentige al tiuj krioj, jen dirante la vortojn, kiujn li sciis ĉiuokaze plej agrablaj, aŭ kiujn subita neceso ŝajnis postuli, ankaŭ li mem parolis dum la tuta vojaĝo. «Jes, sinjoroj; panon, abundon. Mi mem kondukos lin en malliberejon: li estas punota... *si es culpable*. Jes, jes, mi mem ordonos: panon malkara. *Asì es*⁷... tiel estas, mi volas diri: la reĝo nia sinjoro ne volas, ke tiuj ĉi fidelegaj vasaloj suferu malsaton. *Ox! ox! guardaos*⁸: ne vundiĝu, sinjoroj. *Pedro, adelante con juicio*. Abundon, abundon. Iom da spaco, bonvole. Panon, panon. En malliberejon, en malliberejon. Kion?» pli poste li demandis homon, kiu duone sin enĵetis en la fenestron, por al li kriegi konsilon, aŭ peton, aŭ eble aplaŭdon. Sed tiu homo, antaŭ ol aŭdi tiun «kion?», estis retrenita de alia, kiu vidis lin frakasota sub kaleŝ-rado. Ĉe tiaj diroj kaj rebatoj, inter senĉesaj aklamoj, inter eĉ kelkaj opoziciaj vibroj, ĉi tie kaj tie aŭdigataj, sed tuj sufokataj, Ferrer finfine atingis la domon, precipe dank' al la klopodo de tiuj bonkoraj helpantoj.

La aliaj kiuj, kiel dirite, jam ĉeestis same bonintence,

⁷ *Asì es* = Tiel estas.

⁸ *Ox! ox! guardaos* = He! he! gardu vin.

dumtempe jam klopodis liberigi kaj re-liberigi iom da spaco. Per petoj, instigoj, minacoj, per puŝoj kaj repuŝoj, per peloj ĉi tien kaj tien; per la duobligo de fervoro, kaj renovigo de energioj, kiu estiĝas kiam oni vidas la sopiratan celon preskaŭ atingita; finfine ili sukcesis disfendi la amason en du partojn, kaj pli poste ilin repeli; tiel ke inter la pordego kaj la kaleŝo, kiu ekhaltis antaŭ ĝi, troviĝis vaka spaceto. Renzo kiu, iom antaŭirante, iom eskortante, tien alvenis kune kun la kaleŝo, sukcesis starigi sin en unu el la du frontoj de favoruloj, kiuj samtempe spalis la kaleŝon kaj baris la du premantajn ondegojn de popolo. Kaj dum li kunlaboris reteni unu el ili per siaj fortikegaj ŝultroj, li troviĝis ankaŭ en tre taŭga loko por spekti.

Ferrer eligis grandan spiron, vidante tiun spaceton libera kaj la pordon ankoraŭ fermita. Fermita ĉi tie signifas: ne-aperta; cetere la pord-hokoj estis preskaŭ deŝiritaj el la pilastroj: la du pordo-klapoj, splitumite, kontuzite, deformite kaj miskunigite, vidigis tra vasta fendo riglil-pecon malrekta, malfirma kaj preskaŭ malnajlita, kuntenanta, se tiel diri, la du klapojn. Honestulo jam almetis al tiu fendo la vizaĝon, por krii, ke oni malfermu; alia rapide dismalfermis la kaleŝ-pordeton: la oldulo eligis la kapon, sin levis, kaj kaptante per la maldekstra la brakon de tiu honestulo, eliris kaj ekstaris sur la kaleŝa pied-breto.

Ambaŭflanke la tuta homamaso staris pied-pinte, por vidi: mil vizaĝoj, mil levitaj barboj: la ĝeneralaj scivolo kaj atento estigis momentan ĝeneralan silenton. Ferrer, haltinte tiumomente sur la ŝtupeto, rigardis ĉirkaŭen, salutis per sinklino tiun amasegon, kiel el predikejo, kaj metinte la maldekstran manon surbrusten, li kriis: «Panon kaj justecon!»

kaj firma, aplomba, togita, li descendis teren, inter aklamoj leviĝantaj ĝis la steloj.

Intertempe la domanoj malfermis, aŭ pli ĝuste: finmalfermis, forigante la riglilon kune kun la duone malnajlitaj ringoj, kaj vastigante la fendon apenaŭ sufiĉe por enirigi la tre sopiratan gaston. «Rapidu, rapidu», li diris: «malfermu taŭge, ke mi povu eniri; kaj vi, brave, retenu la popolon, ne lasu ke ĝi falu sur min... pro Ĉiela amo! Gardu iom da libera spaco por baldaŭ... He! he! sinjoroj! momenton», li diris pli poste al la domanoj: «malrapide per tiu klapo! lasu min pasi: aj! miaj ripoj! mi rekomendas miajn ripojn. Fermu nun: ne; he! he! la togon, la togon!». Ĝi fakte restus inter la du pordoklapoj, se Ferrer ne retirus tute senĝene ties trenajon, kiu malaperis kiel vosto de vipuro, kiu persekutate rifuĝas en truon.

Rekuniginte la klapojn, oni laŭpove trab-apogis ilin. Ekstere, tiuj kiuj starigis sin korpo-gardistoj de Ferrer, klopodis gardi la spacon libera per ŝultroj, per brakoj, per krioj, sekrete preĝante la Di-Sinjoron rapidigi lin.

«Rapide, rapide», diradis ankaŭ Ferrer, interne sub la portiko, al la servistoj, kiuj ĉirkaŭis lin anhelaj, kriante: «Estu benata! ha ekscelenco! ho ekscelenco! hu ekscelenco!». «Rapide, rapide», ripetis Ferrer: «kie estas tiu benata viro?». La proviantestro desupris tra la ŝtuparo, duontrenate kaj duonportate de aliaj servistoj, blanka kiel ĵus lavita tuko. Vidinte la helpon, li ekspiregis; al li revenis la pulso, ekfluis iom da vivo en la kruroj, iom da koloro sur la vangoj; kaj laŭpove li ekrapidis al Ferrer, dirante: «Mi estas en la manoj de Dio kaj de via ekscelenco. Sed kiel eliri de ĉi tie? Ĉiuloke estas homoj, kiuj volas min morta».

«*Venga usted con migo*⁹, kaj kuraĝu: ĉi-ekstere staras mia kaleŝo; rapidu, rapidu». Li kaptis lin per la mano, kaj kondukis lin al la pordo, plu kuraĝigante lin; sed dume li diris al si mem: — *Acqui està el busilis; Dios nos valga!*¹⁰ —

La pordo malfermiĝas; Ferrer eliras kiel unua; la alia sekvas kuntirite, alkroĉite, algluite al la sava togo, kiel bebo al jupo de panjo. La homoj gardintaj la spacon libera, levante manojn kaj ĉapelojn, estigas kvazaŭ reton aŭ nebulon, por kaŝi al la danĝera rigardo de la homamaso la proviantestron; ĉi-lasta enkaŝiĝas unua, kaj tie sin kaŝas en angulon. Ferrer eniras pliposte; la kaleŝ-pordo fermiĝas. La homamaso videtis, sciiĝis, divenis la okazintaĵon; kaj eligis kriegon el aplaŭdoj kaj sakroj.

La reveturo povus ŝajni pli malfacila kaj pli danĝera. Sed la publika deziro enkarcerigi la proviantestron estis sufiĉe deklarita; kaj, dum la halto, multaj helpintaj la alveturon de Ferrer, klopodis disponigi kaj gardi irejon tra la amaso, tiel ke ĉi-foje la kaleŝo sukcesis veturi iom pli rapide kaj daŭre. Laŭgrade ke ĝi avancis, la duflanke retenitaj popolamasoj refalis unu sur la alian, kaj kunmiksiĝis malantaŭ ĝi.

Ferrer, apenaŭ sidiĝinte, sin klinis por averti la proviantestron, ke, pro Ĉiela amo, li restu tute buliĝinta surgrunde, ne montrante sin; sed la averto tute superfluis. Ferrer male devis montri sin, por tute okupi kaj al si logi la publikan atenton. Kaj dum la tuta dua veturado, kiel dum la unua, li faris al la ŝanĝiĝanta aŭskultantaro paroladon plej malkoheran laŭsence kaj plej longan laŭtempe. Ĝin tamen li

⁹ *Venga usted con migo* = Venu via moŝto kun mi.

¹⁰ *Acqui està el busilis; Dios nos valga* = Ĉi tie kuŝas la enigmo; Dio nin helpu.

interrompetis de tempo al tempo per hispanlingva vorteto flustrita tute haste en la orelon de sia buliĝinta kompano. «Jes, sinjoroj; panon kaj justecon: en la kastelon, en la malliberejon, sub mia gardado. Dankon, dankon, dankegon. Ne, ne: li ne eskapos! *Por ablandarlos*¹¹. Estas tro prave; oni esploros, oni vidos. Ankaŭ mi mem amas viajn moŝtojn. Severan punon. *Esto lo digo por su bien*¹². Ĝustan prez-limon, honestan takson, kaj punon kontraŭ la malsatigantoj. Flanken, bonvole. Jes, jes; mi estas honestulo, amiko de la popolo. Li estas punota: ja vere, li estas fripono, fiulo. *Perdone usted*¹³. Li suferaĉos, li suferaĉos... *si es culpable*. Jes, jes, la panbakistojn ni devigos konduiti laŭdeve. Vivu la reĝo, kaj la bonkoraj Milananoj, liaj fidelegaj vasaloj! Ve al li, ve al li. *Animo; estamos ya quasi fuera*¹⁴.

Fakte ili jam transiris la densan kunpuŝiĝon, kaj estis atingontaj tute liberan vojon. Tie Ferrer, dum li komencis iom ripozigi siajn pulmojn, vidis la malfruan helpon: tiujn hispanajn soldatojn, kiuj fine estis ne tute senutilaj, ĉar, helpate kaj gvidate de civitanoj, ili kunlaboris forsendi en paco iom da homoj, kaj gardi pasejon libera por la fina forveturo. Ĉe l' alveno de l' kaleŝo tiuj soldatoj spaliron formis kaj armil-prezentis al la grand-kanceliero, kiu ankaŭ ĉi tie faris unu saluton dekstre kaj unu maldekstre: kaj al la oficiro, kiu proksimiĝis, por siavice saluti, li diris, akompanante la vortojn per dekstra-mana gesto: «*Beso a usted las manos*¹⁵:» vortojn,

¹¹ *Por ablandarlos* = Por ilin mildigi.

¹² *Esto lo digo por su bien* = Ĉi tion mi diras por via bono.

¹³ *Perdone usted* = Pardonu via moŝto.

¹⁴ *Animo; estamos ya quasi fuera* = Kuraĝe; ni preskaŭ jam eliris.

¹⁵ *Beso a usted las manos* = Mi kisas al via moŝto la manojn.

kiujn la oficiro komprenis laŭ la vere intencita senco, tio estas: ja valoran helpon vi al mi donis! Li responde faris denovan saluton, kaj kuntiris la ŝultrojn. Ja estis konvena kazo por diri: *cedant arma togae*¹⁶; sed Ferrer en tiu momento ne havis en la kapo citaĵojn: kaj cetere ili estus vortoj vane ĵetitaj, ĉar la oficiro ne komprenis latine.

Al Pedro, dum li pasis tra tiu spaliro de infanterianoj, inter tiuj muskedoj tiel respekteme levitaj, en la bruston revenis la iama spirito. Li tute revigliĝis el konsterno, li rememoris kiu do li estas, kaj kiun li veturigas; kaj kriante: «Ho he! ho he!» ne aldonante pliajn ceremoniaĵojn al la popolo, jam sufiĉe maldensa por ke oni povu ĝin trakti ĉi tiel, kaj skurĝante la ĉevalojn, li ilin trotigis direkte al la kastelo.

«*Levantese, levantese, estamos ya fuera*¹⁷» diris Ferrer al la proviantestro; kiu, sekurigite pro la ĉeso de l' kriado kaj la rapidiĝo de l' kaleŝo, malbuliĝis, distiriĝis, leviĝis, kaj iomete revigliĝinte, komencis danki, danki, kaj danki al lia liberiginto. Ĉi-lasto, post kondolenco pro la danĝero kaj gratulo pro l' savo: «Ha!», elkriis al si frapante per la mano la poluritan kukurbon¹⁸, «*que dirà de esto su excelencia*, kiu jam estas tiom humoraĉa pro tiu malbenata Casale, kiu ne volas kapitulaci? *Que dirà el conde duque*, kiu maltrankviliĝas se unu folio bruas pli ol kutime? *Que dirà el rey nuestro señor*, kiun nepre atingos la sciigo pri tia frakaso? *Dios lo sabe*¹⁹».

¹⁶ *cedant arma togae*: latine = cedu armilo al togo, t.e.: civila povo valoras pli ol armea.

¹⁷ *Levantese, levantese, estamos ya fuera* = Leviĝu, leviĝu, ni jam estas elirintaj.

¹⁸ *la poluritan kukurbon*: la kalvan kapon (ironie).

¹⁹ *que dirà de esto su excelencia...el conde duque...el rey nuestro señor... Dios lo sabe* = Kion diros pri tio lia ekscelenco (la guberniestro)... la

«Ha! koncerne min, mi ne volas plu enmiksiĝi», diris la proviantestro», mi proklamas min eksa; mian oficon mi rezignas en la manojn de via ekscelenco; kaj mi foriras vivi en kavernon, sur monto, ermite, for, for de ĉi tia besteca popolaĉo.

«*Usted* faros tion, kio plejmulte konvenos *por el servicio de su magestad*²⁰», respondis grav-miene la grand-kanceliero.

«Lia reĝa moŝto certe ne volos mian morton», rebatis la proviantestro: «en kavernon, en kavernon; for de ĉi tiaj uloj».

Kio do estiĝis el tia intenco, ne diras nia aŭtoro, kiu, akompaninte la kompatindulon ĝis la kastelo, liajn aferojn ne plu mencias.

grafo duko... la reĝo nia sinjoro... Nur Dio scias.

²⁰ *Usted... por el servicio de su magestad* = Via moŝto... por la servo al lia reĝa moŝto.

XIV

La postrestinta homamaso komencis disiri, disbranĉiĝi dekstren kaj malen, tra diversaj stratoj. Kelkaj iris hejmen, por prizorgi ankaŭ siajn privatajn aferojn; aliaj foriĝis, por iom libere spiri post multhora premiĝo; alia iris serĉi amikojn, por babili pri l' grandaj eventoj de l' tago. Simila malpleniĝo okazis ĉe la alia strato-fino, kie la popolo restis iel maldensa, tiel ke tiu hispana taĉmento povis senreziste avanci kaj posteniĝi ĉe la proviantestra domo. Apud ĝi ankoraŭ staris kondensita feĉo,¹ se tiel diri, de l' tumulto; kolektaĉo de kanajloj, kiuj, malkontentaj pro tiel malvarma kaj malperfekta fino de tiom granda preparaĵo, parte grumblis, parte blasfemis, parte konsiliĝis, ĉu ion pluan eblas entrepreni; kaj, kvazaŭ prove, premaĉis kaj puŝaĉis tiun kompatindan pordon, kiu estis iel ajn denove trab-apogita. Ĉe l' alveno de l' taĉmento, ĉiuj, parte tuj-tuje, parte prokrastumante kaj kvazaŭ pene, foriris en malan direkton, lasante la kampon libera al la soldatoj, kiuj ĝin okupis, kaj tie sin starigis garde al la domo kaj la strato. Sed en ĉiuj ĉirkaŭaj stratoj svarmis hom-rondetoj: kie staris du aŭ tri homoj, tie ekhaltis tri, kvar, dudek aliaj: ĉi tie unu disiĝis; tie tuta homrondo ekiris; estis kvazaŭ nubaĉo, kiu foje restas disa kaj tra-ŝvebas la lazuran ĉielon post tempesto, tiel ke supren-rigardanto diras: ĉi-vetero ne tute reboniĝis. Kaj imagu, kiaj babelaj paroloj. Iu rakontis emfaze specialajn okazaĵojn de li viditajn; alia rakontis la agojn de li mem faritajn; tria gratulis ke la afero finiĝis feliĉe, kaj laŭdis je Ferrer, kaj prognozis seriozajn veojn kontraŭ la proviantestro; alia ridaĉis kaj diris: «ne timu: oni ne mortigos lin: lupu ne manĝas karnon de lupu»; alia pli kolere murmuris,

¹ feĉo: plej fia parto.

ke oni ne faris laŭ-deve, ke ĉio estas trompo, ke estis frenezaĵo bruaĉi tiom multe, kaj poste lasi ke oni primokaĉu nin ĉi tiel.

Intertempe la suno jam subiris, kaj ĉiuj objektoj fariĝis unukoloraj; kaj multaj, lacaj el tia tago, kaj enuaj el babilado en mallumo, reiris hejmen. Nia junulo, helpinte la kaleŝveturon, dum helpo estis bezonata, kaj marŝinte ankaŭ li mem kvazaŭ triumfe inter la soldat-vicoj malantaŭ la kaleŝo, plezuriĝis, vidante ĝin kuri libere kaj ekster-danĝere; li tramarŝis iom da strato kune kun la popolamaso, kaj ĉe l' unua strat-angulo li flankeniĝis, por spiri ankaŭ li mem iom libere. Post ne multe da paŝoj en maldenso, li, en la kirlado de tiom da ĵusaj konfuzaj sentoj kaj vidoj, eksentis fortan emon manĝi kaj ripozi; kaj li komencis supren-rigardi ambaŭflanken, serĉante gastejan insignon; ĉar por iri al la kapucenejo, jam estis tro malfrue. Tiel marŝante kun levita kapo, li trafis en homrondon; kaj haltinte, li aŭdis ke oni pridiskutas konjektojn kaj planojn por la morgaŭa tago. Aŭskultinte momente, li ne sin detenis diri mem sian opinion; ĉar li, post tiom pena klopodado, taksis ke ne estas tro pretende fari proponojn. Kaj konvinkite, el tio kion li vidis tiutage, ke, por efektiviĝi aferon, jam nun sufiĉas ĝin plaĉigi al la strat-irantoj, «miaj sinjoroj!» li ekkriis kun enkonduka oratoreco: «ĉu ankaŭ mi mem diru mian modestan opinion? Mia modesta opinio estas jena: ke ne nur koncerne la pano-aferon oni faras friponaĵojn: kaj ĉar hodiaŭ klare vidiĝis, ke, se aŭdigi sian voĉon, oni ricevas juston; necesas daŭrigi ĉi tiel, ĝis rebonigo de ĉiuj ceteraj fiaĵoj, kaj ĝis la mondo iros pli kristane. Ĉu ne veras, miaj sinjoroj, ke ekzistas araĉo da tiranoj, kiuj faras ĝuste la malon ol la dek Ordonoj de Dio, kaj serĉadas homojn pacajn, nezorgantajn pri ili, por al tiuj fari ĉian malbonon; kaj tamen

ili ĉiam pravas? Kaj kiam ili faraĉis ion pli kriman ol kutime, ili marŝas eĉ pli aplombe, tiel ke ŝajnas, ke al ili oni ŝuldas reston? Verŝajne ankaŭ en Milano ja estas da tiaj uloj».

«Bedaŭrinde jes», diris iu voĉo.

«Tion mi ja supozis», reparolis Renzo: «pri tiaĵoj oni ja rakontas ankaŭ ĉe ni. Kaj cetere la afero estas evidenta per si mem. Ni supozu, ekzemple, ke unu el tiuj, kiujn mi aludas, loĝas parte en kamparo, kaj parte en Milano: se li estas diablo tie, imageble li ne estas anĝelo tie ĉi. Diru do al mi, sinjoroj miaj, ĉu oni iam vidis malantaŭ karcer-krado la muzelon de unu el ĉi tiaj uloj. Kaj la plej aĉa afero estas (tion certege mi povas aserti), ke por ilin puni ekzistas presitaj kriaĵoj: kaj ne sensencaj, sed bonege komponitaj kriaĵoj, tiel ke nenion pli bonan ni povus eltrovi: tie estas klare menciitaj la friponaĵoj, ĝuste kiel ili okazas; kaj ĉe ĉiu fiaĵo, ties ĝusta puno. Kaj diras: ĉiu ajn: ĉu malnobeloj, ĉu plebanoj, ĉu mi ne scias kio. Nu vi provu diri al la leĝo-doktoroj, skribistoj kaj fariseoj,² ke ili peru al vi justecon, laŭ ke krias la kriaĵo: ili aŭskultos vin, kiel papo kanajlojn: tio frenezigus la cerbon de ĉia honestulo. Oni do vidas klare, ke la reĝo kaj la regantoj ja volus la kanajlojn punitaj, sed nenio efektiviĝas, ĉar ekzistas fia ligo. Necesas do ĝin rompi; necesas iri morgaŭ matene al Ferrer, li ja estas honesta homo, tute alirebla sinjoro; kaj hodiaŭ videblis, kiel li kontentas troviĝi kun la malriĉuloj, kaj kiel li klopodas aŭskulti la rezonojn al li diratajn; kaj respondas kun afableco. Necesas iri al Ferrer, kaj al li diri, kiel do statas la aferoj; miaflanke mi povas al li rakonti aferojn tiklajn: ke mi mem vidis per miaj okuloj kriaĵon, kun bela blazono sur la

² *leĝo-doktoroj... fariseoj*: ĉi tie, misfarantoj (proprasence, opoziciantoj de Jesuo).

fronto, kaj ĝi estis farita de tri homoj el potenculoj, kaj de ĉiu el ili mi vidis bele presitaj la subskribitajn nomojn, kaj unu el tiuj nomoj estis ĝuste Ferrer: vidita de mi, per miaj okuloj: nu tiu kriaĵo diris aferojn taŭgajn por mia kazo; kaj la leĝo-doktoro, kiun mi petis, ke li faru al mi justecon, laŭ la intenco de tiuj tri sinjoroj, inter kiuj Ferrer: tiu sinjoro doktoro, kiu mem estis al mi montrinta la kriaĵon, afero plej komika, ha! ha! ŝajnis ke mi diras al li frenezaĵojn. Mi certas, ke tiu kara oldulo, kiam li aŭdos ĉi tiajn drolaĵojn; ĉar li mem ĉiujn aferojn ne povas koni, precipe la forajn; li ne volos, ke la mondo pluiru tiele, kaj li metos bonan rimedon. Kaj krome, ankaŭ ili mem, se ili faras kriaĵojn, certe ŝatas, ke oni obeu: ĉar estas malŝato, taksi kiel nulon belan presaĵon kun ilia nomo. Kaj se la perfortuloj ne volas klini la kapon, kaj frenezulas, ĉeestas ni, por lin helpi, kiel ni faris hodiaŭ. Mi ne diras ke li mem devas ĉirkaŭ-kaleŝi, por kapti ĉiujn friponojn, perfortulojn kaj tiranojn; por tio oni ja bezonus la arkeon de Noao³! Necesas ke li ordonu al la komisiitoj, kaj ne nur en Milano, sed ĉiuloke, fari la aferojn konforme al la kriaĵoj; kaj fari taŭgajn juĝ-procesojn super ĉiuj kiuj faris tiujn friponaĵojn; kaj kie estas dirite: karcerero, en karceron! kaj kie dirite: galero, en galeron! kaj ordoni ke la komunumestroj agu laŭdeve; se ne, ilin eksigi, kaj anstataŭigi per pli bonaj; kaj krome, kiel mi jam diris, ĉeestos ni mem por etendi helpan manon. Kaj ordoni ke la leĝo-doktoroj aŭskultu la malriĉulojn kaj pledu por pravuloj. Ĉu mi diras prave, miaj sinjoroj?».

Renzo parolis tiel elkore, ke ek de la komenco granda parto de la homgrupeto interrompis ĉiun alian parolon kaj sin turnis al

³ *arkeon de Noao*: ŝipegon sur kiu, laŭ Biblia rakonto, *Noao* savis el diluvo ĉiujn speciojn de bestoj.

li; kaj iumomente ĉiuj fariĝis liaj aŭskultantoj. Konfuza aplaŭdo-krio, el: «brave! certe! prave! bedaŭrinde veras!» estis kvazaŭ respondo de l' aŭskultantaro. Tamen ne mankis kritikantoj: «Ha jes!», diris iu: «se aŭskulti montaranojn: ĉiuj estas advokatoj»; kaj li foriris. «Nuntempe», murmuris alia, «ĉiu aĉulo volos eldiri sian opinion; kaj, se oni sakon tro plenigas, ĝi baldaŭ ŝiriĝas: tiel ke ni eĉ ne havos la panon malkara, kio estis la celo, por kiu ni elpaŝis». Sed Renzo aŭdis nur la komplimentojn; unu premis al li unu manon, alia premis la duan. «Ĝis revido morgaŭ. – Kie? – Sur la katedrala placo. – Bone. – Bone. – Kaj oni ion faros. – Kaj oni ion faros».

«Kiu el ĉi-sinjoroj bonvolus indiki al mi gastejon, por manĝi buŝplenon, kaj tranokti kiel malriĉa knabo?» diris Renzo.

«Ĉeestas mi, por vin priservi, ho bona junulo», diris iu, atente aŭskultinta lian predikon, kaj ankoraŭ nenion dirinta. «Mi konas ĝuste drinkejon kiu taŭgos por via kazo; kaj mi rekomendos vin al la gastejestro, kiu estas mia amiko, kaj honestulo».

«Ĉu tie ĉi proksime?».

«Ne tre distance», respondis tiu viro.

La homgrupeto malkuniĝis; kaj Renzo, preminte multe da nekonataj manoj, ekiris kun la nekonato, lin dankante pro lia komplezemo.

«Pro kio do?» li diris: «unu mano lavas la alian, kaj ambaŭ la vizaĝon. Ĉu ni ne havas la devon servi al nia proksimulo?». Kaj marŝante, li faris al Renzo, kvazaŭ konversacie, jen unu, jen alian demandon. «Ne por enmiksiĝi en viajn aferojn, sed vi al mi ŝajnas tre laca: de kiu vilaĝo vi venas?».

«Mi venas», respondis Renzo, «mi venas de malproksime, de Lecco».

«Ĉu el Lecco? Ĉu vi loĝas en Lecco?».

«En Lecco... pli ĝuste: en ties teritorio».

«Povra junulo! Laŭ kiom mi sukcesis kompreni el viaj paroloj, oni gravajn misfarojn al vi faris».

«He! mia kara honestulo! mi devis paroli iom diplomate, por ne diri publike miajn aferojn; sed... sufiĉe: iun tagon oni ekscios; kaj tiam... Sed ĉi tie mi vidas gastejan insignon; kaj ver-vere mi ne emas iri pli foren».

«Ne, ne! venu tien, kien mi diris: ĝi ne estas fora», diris la gvidanto: «tie ĉi vi ne bonstatus».

«He, jes», respondis la junulo: «mi ne estas senjoreto kutima kuŝi en vato: io simpla por en-buŝigi kaj pajlo-matraco al mi sufiĉas: mi nur bezonas trovi rapide ambaŭ ĉi-aferojn. Fidon je Providenco!». Kaj li eniris tra pordaĉo, super kiu pendis insigno de plena luno.

«Bone; mi kondukos vin ĉi tien, ĉar tio al vi plaĉas», diris la nekonato; kaj li sekvis lin.

«Ne necesas, ke vi ĝenu vin plue», respondis Renzo. «Tamen», li aldonis, «se vi venas drinki kun mi unu vinglason, vi faras al mi plezuron».

«Mi akceptos viajn ĝentilaĵojn», respondis tiu viro; kaj, kiel pli sperta pri la loko, li antaŭ Renzo trairis korteton; proksimiĝis al la kuireja pordo, levis la klinkon, malfermis, kaj eniris kun sia kunulo. Tie du porteblaj lumiloj, pendantaj de du stangoj kroĉitaj al la plafon-trabo, disradiis duonan lumon. Multe da homoj sidis ne senlabore sur du benkoj ambaŭflanke de mallarĝa longa tablo, kiu okupis preskaŭ unu flankon de la ĉambro: ie kaj tie tablo-tukoj kaj teleroj; ie kaj ĉi

tie lud-kartoj turnataj kaj returnataj, lud-kuboj ĵetataj kaj levataj, ĉie vin-flaskoj kaj glasoj. Oni vidis ankaŭ diskuri *berlinga, reale* kaj *parpagliola*-monerojn⁴, kiuj, se povi paroli, verŝajne dirus: – ĉi-matene ni kuŝis en la mon-bovlo de bakisto, aŭ enpoŝe de tumulto-spektanto, kiu, tute absorbite pri l' publikaj aferoj, forgesis vigli super siaj privataj. – La bruado estis granda. Kelnero iris-reiris rapidege, por priservi tiun kaj manĝan kaj ludan tablon; la gastejestro sidis sur benketo, sub la kamen-kapuĉo, laŭŝajne okupite ĉe desegnaĵoj, kiujn li faris kaj malfaris sur la cindro per karbo-tenaĵlo; sed fakte tute atenta pri ĉio okazanta ĉirkaŭ li. Ĉe l' bruado de l' klinko, li leviĝis kaj iris renkonte al la alvenintoj. Vidinte la gvidanton, – malbenata! – li diris en si mem: – kial veni enmiksiĝi, ĝuste kiam mi tute ne vin volus! – Kaj rigardinte Renzon, li aldonis en si mem: – mi ne konas vin; sed venante kun tia ĉasisto, certe vi estas aŭ hundo aŭ leporo: post kiam vi diros du vortojn, mi ekkonos vin. – Tamen el tiaj pripensoj nenio travidiĝis sur la vizaĝo de l' gastejestro, kiu staris senmova kvazaŭ portreto: rondeta kaj brila vizaĝo, kun densa, ruĝeska barbeto, kaj du helaj, fiks-rigardaj okuletoj.

«Kion ordonas ĉi-sinjoroj?» li diris laŭtvoĉe.

«Antaŭ ĉio, bon-kvalitan flaskon da vere natura vino», diris Renzo: «kaj poste buŝplenon por manĝi». Tion dirante, li sid-faligis sin sur benkon, ĉe l' fino de la tablo, kaj eligis sonoratan «ha!», kvazaŭ li volus diri: «Ja bonas iom da benkosido, post longa starado kaj klopodado. Sed tuj li rememoris la benkon kaj la tablon, ĉe kiu li sidis lastafoje kun Lucia kaj Agnese: kaj li eligis suspiron. Poste li skuis la kapon, kvazaŭ por forpeli tiun penson; kaj li vidis la gastejestron veni kun la

⁴ *berlinga, reale, parpagliola*: tiamaj monunuoj.

vino. La kompano jam sidiĝis fronte al Renzo. Ĉi-lasta tuj al li verŝis por drinki, dirante: «Por malsekigi la lipojn». Kaj pleniginte la alian glason, li ĝin trinkegis unuglute.

«Kion vi donos al mi por manĝi?» li poste demandis la gastejstron.

«Mi havas da stufaĵo⁵: ĉu ĝi plaĉas al vi?» diris ĉi-lasta.

«Jes, brave; da stufaĵo».

«Vi estas servota», diris la gastejestro al Renzo; kaj al la kelnero: «priservu tiun ĉi fremdulon». Kaj li ekiris al la kameno. «Sed...» li reparolis, revenante al Renzo: «da pano en ĉi tia tago mi ne havas».

«Por pano», diris Renzo laŭtvoĉe kaj ridante, «zorgis la Dia Providenco». Kaj li eligis la trian kaj lastan el tiuj panbuloj prenitaj sub la kruco de sankta Dionizio, li levis ĝin alten, kriante: «jen la pano de la Providenco!». Ĉe l' elkrio, multaj sin turnis; kaj vidante tiun levitan trofeon⁶, iu kriis: «Vivu la pano malkara!». «Ĉu malkara?» diris Renzo: «*gratis et amòre*.⁷». «Pli bone, des pli bone».

«Sed», tuj aldonis Renzo: «mi ne volas ke viaj moŝtoj suspektu. Mi tute ne ŝtelkaptis ĝin. Mi ĝin trovis surgrunde; kaj se mi sukcesus trovi ties mastron, mi pretas ĝin pagi».

«Brave! brave!» kriis, ridaĉante pli brue, la gajuloj; el kiuj neniu imagis, ke tiuj vortoj estas verdiraj.

«Ili kredas, ke mi ŝercas; sed la afero statas ĝuste tiel ĉi», diris Renzo al la gvidanto; kaj turnante tiun panbulon en la mano, li aldonis: «vidu kiel oni ĝin aranĝaĉis; ĝi aspektas kiel plata bulko: ĉeestis multege da popolo! Kaj se troviĝis da

⁵ *stufaĵo*: viando longe, moder-varme kuirita en fermita kaserolo.

⁶ *trofeon*: militkaptaĵon, kiel simbolon de venko kaj triumfo.

⁷ *gratis et amòre*: latine = senpage kaj donace.

homoj kun molaj ostoj, tiuj certe estus aĉe aranĝitaj». Kaj tuj, gluteginte tri aŭ kvar mordaĵojn de tiu pano, li akompanis ilin per dua glaso da vino; kaj aldonis: «ĉi-pano ne volas glutigi senakompane. Neniam mi havis la gorĝon tiel seka. Oni hodiaŭ tre multe kriegis!». «Pretigu bonan liton por ĉi tiu bona junulo», diris la gvidanto: «ĉar li intencas tranokti ĉi tie».

«Ĉu vi volas tranokti ĉi tie?» Renzon demandis la gastejestro, proksimiĝante al la tablo.

«Tute jes», respondis Renzo: «modesta lito; sufiĉas ke la littukoj estu lavitaj; ĉar mi estas malriĉa knabo, sed kutima al pureco».

«Ho, ĉi-koncerne!» diris la gastejestro: li iris al iu benko staranta en angulo de la kuirejo; kaj li revenis kun inkujo kaj paper-peco en unu mano, kaj plumo en la alia.

«Kion signifas tio?» elkriis Renzo, glutegante buŝplenon el la stufaĵo al li surtabligita de la kelnero, kaj ridetante miroplene li aldonis: «ĉu ĝi estas la lesiv-lavita littuko?». La gastejestro senresponde demetis la inkujon kaj la paperon sur la tablon; poste sur ĝin li apogis la maldekstran brakon kaj la dekstran kubuton; kaj, kun la plumo supren kaj la vizaĝo direkte al Renzo, al li diris: «bonvolu al mi diri viajn antaŭnomon, nomon, kaj naskiĝlokon».

«Kio?» diris Renzo: «kiel ĉi-aferoj koncernas liton?». «Mi plenumas mian devon», diris la gastejestro, rigardante al la vizaĝo de l' gvidanto: «ni havas la devon doni raporton pri ĉiuj venantaj tranokti ĉe ni: *antaunomon kaj nomon, kaj el kiu lando li estas kaj por kiu afero li venas, ĉu li kunhavas armilojn... dum kiom da tempo li estas haltonta en tiu ĉi urbo...* Estas vortoj de la kriaĵo».

Antaŭ ol respondi, Renzo malplenigis alian glason: ĝi

estis la tria; kaj ek de nun mi timas, ke ni ne plu sukcesos ilin kalkuli. Poste li diris: «ha ha! vi havas la kriaĵon! Kaj mi imagas min leĝo-doktoro; kaj tiam mi tuj scias, kiel oni la kriaĵojn konsideras».

«Mi veron diras», diris la gastejestro, plu rigardante la mutan kunulon de Renzo; kaj, reirinte al la benko, li eligis el tirkesto grandan paper-folion, aŭtentikan ekzempleron de la kriaĵo; kaj li venis malfaldi ĝin antaŭ la okuloj de Renzo.

«Ha! jen!» li elkriis, levante per unu mano la denove plenigitan glason, kaj tuj malplenigante ĝin denove, kaj etendante la alian manon, kun unu fingro streĉita direkte al la kriaĵo: «jen bela paĝo de mes-libro⁸. Treege mi gratulas. Tiun blazonon mi konas; mi scias, kion signifas tiu ariana⁹ vizaĝo, kun ŝnuro ĉirkaŭ la kolo». (Frontpaĝe de l' kriaĵoj oni tiam metis la blazonon de la guberniestro; kaj en tiu de Don Gonzalo Fernandez de Cordova vidiĝis maŭra reĝo kun katenita kolo). «Tiu vizaĝo signifas: komandas povanto, obeas volante. Kiam tiu ĉi vizaĝo enkarcerigos sinjoron Don... sufiĉe, mi ja scias kiu; kiel li diras en alia simila mes-libra paĝo; kiam li dispozicios, ke honesta junulo povas edzinigi honestan junulinon, kiu ŝatas lin edzigi, tiam mi al tiu ĉi vizaĝo diros mian nomon; mi aldonos eĉ kison. Mi ja povas havi miajn pravajn kialojn, por ne diri mian nomon. Nu ĉarme! Kaj se kanajlego, havanta sub sia komando bandon da aliaj kanajloj: ĉar se li estus sola...» kaj ĉi tie li finis la frazon per gesto: «kaj se kanajlego volus ekscii, kie do mi estas, por al mi fari fian ŝercon, mi ja demandas, ĉu tiu ĉi vizaĝo ion

⁸ *paĝo de meslibro*: papero grandformata kiel paĝo de meslibro.

⁹ *ariana*: arianoj estis kristanaj herezuloj; pli sube, *maŭra*: maŭroj estis islamanaj; sed Renzo konfuzas ilin.

farus, por min helpi. Ĉu mi devus eldiri miajn aferojn! Ankaŭ ĉi tio estas novaĵo. Ni supozu, ke mi venis al Milano, por pekconfesi; sed mi intencas pekconfesi ĉe kapuceno, ekzemple, kaj ne ĉe gastejestro».

La gastejestro silentadis, kaj plu rigardis la gvidanton, kiu tute nenian esprimon elmontris. Renzo, ni bedaŭras tion diri, eltrinkegis alian vin-glason, kaj daŭrigis: «mia kara gastejestro, mi prezentos al vi rezonon, kiu konvinkos vin. Se l' kriaĵoj bone dirantaj favore al bonaj kristanoj ne validas; des malpli devas validi la dirantaj malbone. Vi do forportu ĉiujn implikaĵojn ĉi, kaj alportu anstataŭe alian flaskon; ĉar tiu ĉi estas fendita». Tion dirante, li frapetis ĝin per fingr-artiko, kaj aldonis: «Aŭdu, aŭdu, gastejestro, kiel ĝi kraketas».

Ankaŭ ĉi-foje Renzo iom post iom altiris la atenton de l' ĉirkaŭsidantoj: kaj ankaŭ ĉi-foje lia aŭskultantaro lin aplaŭdis.

«Kion mi faru?» diris la gastejestro, rigardante tiun nekonaton, kiu estis de li konata.

«Ek, ek», ekkriis multaj el tiuj gajuloj: «pravas tiu junulo: ĉiuj-ĉi aferoj estas nur trudaĵoj, kaptiloj, ĝenaĵoj: nova leĝo hodiaŭ, nova leĝo».

Inter tiaj krioj, la nekonato, okulumante al la gastejestro riproĉe pro lia tro malkaŝa demando, diris: «lasu lin fari laŭplaĉe: ne estigu skandalon».

«Mi faris mian devon», diris la drinkejestro laŭtvoĉe; kaj li aldonis sekrete en si mem: – nun ŝirmita mi estas. – Kaj li prenis paperon, plumon, inkujon, kriaĵon, kaj la malplenan flaskon, por ĝin liveri al la kelnero.

«Alportu samkvalitan», diris Renzo, «ĉar mi trovas ĝin laŭdeva; kaj ni enlitigos ĝin same kiel la alian, ne demandante ties antaŭnomon kaj nomon, kaj el kiu lando ĝi estas, kaj por

kiu afero ĝi venas, kaj ĉu longtempe ĝi estas haltonta en ĉi urbo».

«Samkvalitan», diris la gastejestro al la kelnero, donante al li la flaskon; kaj li reiris sidiĝi sub la kamen-kapuĉo. – Kaj kia leporo! – li pensis, denove desegnante sur la cindro: – kaj en kiajn manojn vi trafis! Azenaĉo! se vi volas droni, vi dronu do; sed la gastejestro ĉe l’ Plena Luno tute ne koncerniĝu pro viaj frenezaĵoj. –

Renzo dankis la gvidanton, kaj ĉiujn aliajn pledintajn por li. «Bonkoraj amikoj!» li diris: «mi nun vere vidas, ke honestuloj reciproke sin helpas kaj subtenas». Poste, etendante la dekstran super la tablo, kaj denove kun sinteno de predikanto: «granda afero», li elkriis, «ke ĉiuj kiuj regas la mondon, ĉien volas enmiksi paperon, plumon kaj inkujon! Ĉiam kun levita plumo! Tiuj moŝtuloj havas grandan manion por plumo!». «He, vi honestulo el kamparo! Ĉu vi volas ekscii la kialon?» diris ridante unu el tiuj kart-ludantoj, kiu estis gajnanta.

«Ni aŭdu do», respondis Renzo.

«La kialo estas», diris tiu homo: «ke ĝuste tiuj moŝtoj manĝas anserojn, kaj do ili trovas ĉe si tiom multege da plumoj¹⁰, ke per ili do nepras ion fari».

Ĉiuj ekridis, escepte de lia malgajnanta kunludanto.

«Jen!» diris Renzo: «poeto li estas. Ankaŭ ĉi tie estas da poetoj: fakte da ili naskiĝas ĉiuloke. Ankaŭ mi mem havas poezian vervon, kaj foje mi diras kuriozaĵojn... sed nur kiam la aferoj iras glate».

Por kompreni ĉi tiun sensencaĵon de l’ kompatinda

¹⁰ plumoj: kiel konate, oni tiuepoke uzis anserajn flugilplumojn kiel skribilojn.

Renzo, oni nepre devas scii, ke ĉe l' popolaĉo de Milano, kaj de l' ĉirkaŭkamparo eĉ pli multe, la termino poeto tute ne signifas, kiel laŭ ĉiuj honestuloj, sanktan talenton, loĝanton de Pindo, disĉiplon de l' Muzoj¹¹; ĉe l' popolaĉo ĝi signifas cerbon bizaran, iom ekstravagancan, kiu, ĉe paroloj kaj faroj, estas pli sprita kaj stranga ol racia. Tiom multe la fuŝanta plebo aŭdacas manipuli la vortojn, al ili havigante signifojn plej forajn de ilia ĝusta senco! Ĉar, mi demandas vin, kion komunan havas poeto kun bizara cerbo?

«Sed la ĝustan kialon al vi diros mi mem», aldonis Renzo: «tio estas ke, ĉar ili mem tenas la plumon, la vortoj de ili dirataj forflugas kaj malaperas; sed la vortojn de malriĉa knabo ili tute priatentas, kaj tuj tuj per tiu plumo trapikas en aero, kaj alnajlas al papero, por ilin eluzi sia-tempe kaj loke. Ili havas ankaŭ alian malicon: ke kiam ili volas trompi povran knabon, kiu ne studis, sed havas iom da... mi scias, kion mi aludas...» kaj, por komprenigi la aludon, li al si marteletis la frunton per la pinto de la montro-fingro; «kaj ili ekvidas ke tiu homo malkovras la trompon, puf!, ili enmiksas en la parolon kelke da latinaj vortoj, por ke li perdu la parol-fadenon, kaj por konfuzi lian kapon. Sufiĉe; aregon da misaj kutimoj oni devas ĉesigi! Ĉiel ajn, hodiaŭ ĉio okazis popollingve, kaj sen papero, plumo kaj inkujo; kaj morgaŭ, se l' homoj kapablos agi konforme, oni faros eĉ pli bone: tute tamen sen tordi eĉ unu haron; ĉio per justeco!». Intertempe kelke el tiuj gajuloj rekomencis ludi, aliaj manĝi, multaj kribi; kelkaj foriris; aliaj

¹¹ *Pindo...* *Muzoj*: laŭ la helena mitologio, monto *Pindo* estis loĝejo de la *Muzoj*, diinoj inspirantaj poetojn kaj artistojn. Ĉi tie Manzoni ŝerce aludas la debaton inter klasikistoj kaj romantikistoj: ĉi-lastaj, al kiuj li mem apartenis, emis kompari la poezian inspiron kun speco de frenezo.

alvenis; la drinkejestro priatentis unujn kaj aliajn: sed ĉio tio ne koncernas nian historieton. Ankaŭ la nekonata gvidanto sopiregis foriri; laŭŝajne li havis neniun negocaferon en tiu loko; tamen li ne intencis foriri, sen iom da plua babilo kun Renzo aparte. Li sin turnis al li, kaj reparolis pri l' pano; kaj, post kelke el tiaj frazoj, kiuj jam kelktempe kuris tra ĉies buŝoj, li elmetis sian propran projekton. «He! Se mi mem komandus», li diris, «mi ja eltrovus la rimedon, por irigi la aferojn ĝuste».

«Kiel vi farus?» diris Renzo, lin rigardante per du okuletoj brilaj pli ol deve, kaj iom tordante la buŝon, kvazaŭ por esti pli atenta.

«Kiel mi farus?» diris tiu viro: «mi volas ke estu pano por ĉiuj; tiel por malriĉuloj, kiel por riĉuloj».

«Ha! tiel estas bone», diris Renzo.

«Jen kiel mi farus. Ĝustan prezlimon, tiel ke ĉiuj povu vivteni sin. Kaj krome disdoni panon, proporcie de l' buŝoj: ĉar ekzistas maldiskretaj manĝemuloj, kiuj volas ĉion por si mem, kaj akaparegas kaj kaptegas ĉiamaniere; kaj pro tio mankas pano por la malriĉa popolo. Do: dividi la panon. Kaj kiel fari? Jen: doni taŭgan paperon al ĉiu familio, proporcie de l' buŝoj, por rajtigi aĉeti panon ĉe l' bakisto. Al mi, ekzemple, oni devus liveri paperon ĉi-specan: Ambrogio Fusella, profesie glavo-faristo, kun edzino kaj kvar gefiloj, ĉiuj sufiĉe aĝaj por manĝi panon (ĉi tion rimarku!): al li oni donu tiom da pano, kaj li pagu tiom da mono. Sed fari ĉion ĝustan, ĉiam proporcie de l' buŝoj. Al vi, ekzemple, oni devus skribi paperon por... via nomo, kio?». «Lorenzo Tramaglino», diris la junulo; kiu, ravite de la projekto, ne rimarkis, ke ĝi estas tute bazita sur papero, plumo kaj inkujo; kaj ke por ĝin

efektivigi, oni devas unue kolekti la nomojn de l' personoj.

«Bonege», diris la nekonato; «sed ĉu vi havas edzinon kaj gefilojn?». «Mi ja devus... gefilojn ne... estas tro frue... sed edzinon... se la mondo irus laŭdeve...». «Ha, vi estas sola! Vi paciencu, sed vi rajtas pli etan porcion».

«Estas prave; sed se baldaŭ, kiel mi esperas... kaj per la helpo de Dio... Sufiĉe; kio, kiam ankaŭ mi mem havus edzinon?». «Tiam oni ŝanĝus la paperon kaj pliigus la porcion. Kiel mi jam diris: ĉiam proporcie de l' buŝoj», diris la nekonato, ekstarante.

«Tiel estas bone», kriis Renzo; kaj li daŭrigis, kriante kaj batante per pugno surtablen: «kaj kial do oni ne faras leĝon tiel ĉi?». «Mi ne scias, kion al vi diri. Dume mi al vi deziras bonan nokton kaj foriras; ĉar mi pensas ke miaj edzino kaj gefiloj min atendas jam delonge».

«Ankoraŭ vin-guton, ankoraŭ vin-guton», kriis Renzo, plenigante rapide lian glason; kaj subite leviĝinte, kaj lin kaptinte ĉe l' basko de la jako, lin tiris energie, klopodante sidigi lin denove. «Alian vin-guton: ne faru al mi ofendon tian».

Sed la amiko per ektirego liberigis sin kaj, lasante Renzon plu diri konfuzan aron da insistoj kaj riproĉoj, diris denove: «bonan nokton», kaj foriris. Renzo al li plu predikis, kiam tiu jam estis surstrate; kaj poste li denove fal-sidiĝis sur la benkon. Li fiks-rigardis tiun ĵus plenigitan glason; kaj vidante la kelneron pasi antaŭ la tablo, li al tiu gestis, ke li haltu, kvazaŭ li havus iun aferon por komuniki; poste li indikis al li la glason, kaj kun malrapida kaj solena dirmaniero, kaj speciale emfazante la vortojn, li diris: «jen, mi pretigis ĝin por tiu honestulo: vidu; plena ĝisrande, tute amikece; sed li ne

akceptis ĝin. Homoj foje havas kuriozajn ideojn. Mi ne kulpas: mian bonkorecon mi montris. Sed nun, ĉar la afero estas farita, oni devas eviti, ke ĝi aĉiĝu». Tion dirinte, li ĝin prenis kaj malplenigis unuglute.

«Mi komprenis», diris la kelnero, forirante.

«Ha! Eĉ vi mem komprenis», reparolis Renzo: «tio estas do vera. Kiam rezonoj pravas...!». Ĉi tie ni bezonas nian tutan amon al la vero, por fidele daŭrigi rakonton, kiu tiel malmulte honoras rolulon tiel gravan, oni preskaŭ povus diri: la ĉefrolulon de nia historio. Sed tiu ĉi sama senpartieco nin devigas atentigi, ke estis la unua fojo, ke tiaĵo trafis Renson: kaj ĝuste tio, ke li tute ne estis kutima al diboĉoj, kaŭzis, ke la unua al li tiom fatalis. Tiuj nemultaj sinsekvaj vin-glasoj, kiujn kontraŭ sia kutimo li traglutis komence, parte pro la soifego kiun li sentis, parte pro tiu ekscito kiu al li nenion moderan ebligis fari, tuj tuŝis lian cerbon: ĉe drinkulo iom sperta, ili nenion kaŭzus krom sensoifigon. Ĉi-teme nia anonima aŭtoro faras rimarkon, kiun ni raportas: kaj ĝi valoru kiom ajn ĝi valoras. Moderaj kaj honestaj moroj, li diras, havigas ankaŭ jenan avantaĝon: ke ju pli ili estas oldaj kaj radikintaj, des pli facile, se oni apenaŭ ilin forlasas, ili tuj sentigas malbonajn efikojn; tiel ke la subjekto ilin longtempe memoras; kaj eĉ stultaĵo al li estas instrua.

Ĉiel ajn, kiam la unuaj nebuloj atingis la cerbon de Renzo, vino kaj vortoj senmodere kaj senregule pluiris, ĝi suben kaj ili supren: kaj en la momento ĉe kiu ni lasis lin, li jam fartis iele-tiele. Li sentis grandan emon paroli: ne mankis da aŭskultantoj, aŭ almenaŭ ĉeestantoj kiujn li povus konsideri tiaj; kaj dum iom da tempo ankaŭ la vortoj elfluis ne petite, kaj lasis sin disponi iel orde. Sed iom post iom, fini frazojn

fariĝis afero terure malfacila. La penso, aperinte viva kaj rezoluta al lia menso, subite nebuliĝis kaj svenis; kaj la vorto, alveninte post longa atendigo, ne estis trafa por la kazo. Ĉe tiaj problemaĵoj, pro unu el la falsaj instinktoj, kiuj ĉe multe da aferoj homojn ruinigas, li sin turnis al tiu benata flasko. Sed kian helpon povus doni vin-flasko en tia situacio, diru homo kun eminenta prudento.

Ni raportos nur kelke el multege da vortoj, kiujn li eligis dum tiu malfeliĉega vespero: la ege plimultaj, kiujn ni pretersilentas, estus tro malkonvenaj; ĉar ili ne nur estas sensencaj, sed eĉ ne senco-ŝajnaj: nepra kondiĉo ĉe libro presita.

«Ha gastejestro, gastejestro!» li reparolis, okule sekvante lin ĉirkaŭ la tablo, aŭ sub la kamen-kapuĉo; foje fiksrigardante lin tie, kie li ne estis, kaj plu parolante tra la bruo de la kunularo: «kia gastejestro vi estas! Tiaĵon mi ne povas akcepti... tian embuskon pri antaŭnomo, nomo kaj negoco. Al honesta knabo kia mi estas....! Vi ne bone kondukis. Kian plezuron, kian sukcon, kian guston... surpaperigi povran knabon? Ĉu mi diras prave, sinjoroj? Gastejestroj devus partii por bonaj knaboj... Aŭdu, aŭdu, gastejestro; mi volas proponi al vi komparon... pro tio ke... Oni ridas ĉu? Mi estas iom verva, jes... sed la rezonojn mi diras ĝustaj. Diru do al mi; kiu do prosperigas vian butikon? La malriĉaj knaboj, ĉu ne? ĉu mi diras prave? Vidu do, ĉu iam tiuj moŝtuloj de l' kriaĵoj venas drinki ĉe vi glaseton».

«Ĉiuj akvo-trinkantoj», diris najbaro de Renzo.

«Ili volas resti sobraj», aldonis alia, «por kapabli mensogi laŭdeve».

«Ha!» kriis Renzo «nun parolis la poeto. Do ankaŭ vi

mem komprenas miajn rezonojn. Vi do respondu, gastejestro: eĉ Ferrer, kiu estas plej bona el ĉiuj, ĉu li venis iam ajn tosti, kaj elspezi eĉ unu groŝon? Kaj ĉu tiu hundaĉo, tiu murdisto, kiu estas Don...? Mi silentas ĉar mia cerbo estas eĉ tro prudenta. Ferrer kaj patro Crrr... mi ja scias, estas du honestuloj; sed da honestuloj estas malmulte. Olduloj pli aĉaj ol junuloj; kaj junuloj... pli aĉaj ol olduloj. Tamen mi ĝojas, ke sangon oni ne verŝis: fi; barbaraĵoj, kiujn oni lasu al ekzekutisto. Panon; ho tio jes. Mi ricevis tiom da puŝegoj; sed mi... ankaŭ donis da ili. Spacon! abundon! vivu!... Tamen, eĉ Ferrer... kelke da latinaj vortetoj... *siès baraòs trapolorum...*¹² Damnita malvirto! Vivu! justecon! panon! ha, jen la ĝustaj vortoj!... Tie devus ĉeesti tiuj honestuloj, kiam eksplodis tiu damnita ton-ton-ton, kaj ankoraŭ ton-ton-ton. Tiuokaze oni ne forkurus, jen. Teni firme tiun sinjoron pastron... Mi ja scias, kiun mi aludas!». Ĉe tiu vorto, li mallevis la kapon, kaj restis kelk-momente kvazaŭ absorbita: poste li eligis suspiregon, kaj li levis la vizaĝon, kun du malsekaj kaj brilaj okuloj, kaj kun tiel langvora kaj plumpa korpremo, ke ve, se tiu, kiu estis objekto¹³ de tiuj sentoj, povus lin vidi en tiu momento. Sed tiuj viraĉoj, kiuj jam komencis amuziĝi pri la pasia kaj konfuza elokvento de Renzo, des pli sin amuzis pri tiu afliktita mieno; la plej proksimaj diris al la aliaj: rigardu; kaj ĉiuj sin turnis al li; tiel ke li fariĝis la amuzilo de la tuta kompanio. Certe ne ĉiuj estis en sia plej bona prudento-stato, aŭ en sia ajna ordinara prudento; sed verdire neniu estis for de ĝi kiom la povra Renzo: kaj krome li estis kamparano. Jen iu, jen alia,

¹² *siès baraòs trapolorum*: sensencaj vortoj, imitantaj la hispanan lingvon de Ferrer, kiun Renzo erare taksas latina.

¹³ *objekto*: Lucia

komencis lin inciti per stultaj kaj vulgaraj demandoj, per mokaj ceremoniaĵoj. Renzo, jen montris sin ofendo-senta, jen akceptis la aferon ŝerca, jen, tute neglektante ĉiujn voĉojn, parolis pri tute alia temo, jen li respondis, jen li demandis; ĉiufoje salte kaj sentaŭge. Bonŝance ke, en tia deliraĵo, li tamen gardis kvazaŭ instinktan atenton eviti la person-nomojn; tiel ke eĉ la nomo, kiu certe estis plej profunde stampita en lia memoro, ne estis eldirita: ĉar tro multe ni bedaŭrus, se tiun nomon, por kiu ankaŭ ni mem havas iom da am-sento kaj respekto, oni trenacŭs tra tiuj fiaj buŝoj, kaj ĝi fariĝus amuzaĵo de tiuj abomenindaj langoj.

XV

La gastejestro, vidante la ludon fariĝi tro longa, proksimiĝis al Renzo; kaj petante tute bon-tone la ceterajn lasi lin trankvila, li ade skuetis lin ĉe unu brako kaj klopodis al li komprenigi kaj persvadi, ke li iru dormi. Sed Renzo plu kaj plu reparolis pri antaŭnomo kaj nomo kaj kriaĵoj, kaj bonaj knaboj. Tamen tiuj du vortoj: lito kaj dormi, ripetataj ĉe lia orelo, finfine eniris en lian kapon; ili al li sentigis iom pli klare la bezonon de tio, kion ili signifas, kaj estigis momentan mens-klarecon. La parteto de prudento, kiu al li revenis, iel konsciigis lin, ke plej granda parto de ĝi estas jam for, proksimume samkiel la lasta ankoraŭ brulanta kandel-stumpo de iluminaĵo vidigas la ceterajn estingitaj. Li kuraĝigis sin; li etendis la manojn kaj premapogis ilin sur la tablon; li unu kaj du fojojn provis leviĝi; li suspiris, ŝanceliĝis; la trian li sukcesis ekstari, subtenate de l' gastejestro. Ĉi-lasto, plu subtenante lin, kondukis lin elinter la tablo kaj la benko; kaj, per unu mano preninte lumilon, per la alia lin parte kondukis kaj parte trenaciis laŭpove, direkte al la ŝtupar-pordo. Tie Renzo, ĉe l' bruo de l' salutoj de l' kriegantoj malantaŭ lin, subite returnis sin; kaj se lia subtenanto ne lerte rapidus lin tenegi ĉe unu brako, la returno certe fariĝus falego; li do returnis sin, kaj per la alia brako, kiu al li restis libera, tranĉadis la aeron kaj desegnadis en ĝi salutojn komplikajn kvazaŭ nodon de Salomono¹.

«Ni iru enliten, enliten», diris la gastejestro, trenacante lin; li igis lin trafi la pordon; kaj eĉ pli pene li tiris lin supren tra tiu ŝtupareto, kaj poste en la ĉambron por li destinitan. Renzo, vidinte la liton, kiu atendis lin, ekĝojis; li rigardis

¹ *nodon de Salomono*: ne solveblan plektaĵon.

amoplene la gastejestron, per du okuletoj, kiuj jen brilegis, jen eklipsiĝis,² kiel du lampiroj³; li klopodis ekvilibri sur la kruroj; li etendis la manon al la vizaĝo de l' gastejestro, por kapteti lian makzelon, esprime de amikeco kaj dankemo; sed li ne sukcesis. «Brave, gastejestro!» li tamen sukcesis diri: «nun mi vidas, ke vi estas honestulo: jen bona faro, doni liton al bona knabo; sed via fuŝaĵo kontraŭ mi, pri antaŭnomo kaj nomo... tio ne estis honestula faro. Bonŝance ke mi estas ruza miaporcie...».

La gastejestro, kiu ne supozis, ke tiu homo ankoraŭ tiom kapablas kunligi pensojn; la gastejestro, kiu el longa sperto sciis, kiom homoj en tia stato pli facile ŝanĝas opinion, decidis elprofiti tiun momentan mens-klarecon, por fari pluan provon. «Kara fileto», li diris kun tute afablaj voĉo kaj sinteno: «mi tion faris ne por ĝenaĉi vin, nek por scivoli viajn aferojn. Kion fari? estas leĝe: ankaŭ ni mem devas obei; se ne, ni devas kiel unuaj suferi sankciojn. Preferindas ilin kontentigi, kaj... pri kio temas fin-fine? Granda afero! diri du vortojn. Ne por ili, sed por fari komplezon al mi: nu; tie ĉi, vizaĝ-al-vizaĝe, ni faru niajn aferojn; vi diru vian nomon, kaj... kaj poste vi enlitiĝas kvieta-kore».

«Ha kanajlo!» elkriis Renzo: «fripono! vi tuŝas denove la fi-aferon de antaŭnomo, nomo kaj negoco!».

«Silentu, burleskulo;⁴ enlitiĝu», diris la drinkejestro.

Sed Renzo daŭrigis pli laŭte: «mi komprenis: ankaŭ vi apartenas al la fi-ligo. Atendu, atendu, ke mi aranĝas vin». Kaj turnante la kapon al la ŝtupareto, li komencis kriegi eĉ pli

² *eklipsiĝis*: estingiĝis.

³ *lampiroj*: noktaj insektoj kun intermite lumantaj organoj.

⁴ *burleskulo*: ŝerculo, bufono.

forte: «amikoj, la gastejestro apartenas al la...».

«Mi diris tion ŝerce», li kriis kontraŭ la vizaĝon de Renzo, puŝante lin al la lito: «nur ŝerce: ĉu vi ne komprenis ke mi diris tion ŝerce?».

«Ha! ŝerce: nun vi bone parolas. Se vi diris ĝin ŝerce... estas ja ŝerco». Kaj li falis en-liten sur-ventre.

«Ek! senvestigu vin; rapide», diris la gastejestro, kaj al la konsilo li aldonis helpon, ĉar ĝi estis ja bezonata. Post kiam Renzo demetis la jakon (tio bezonis longan penadon), la gastejestro tuj kaptis ĝin, kaj rapidigis siajn manojn al la poŝoj, por vidi, ĉu enestas... la kadavro⁵. Li trovis ĝin, kaj pensante ke morgaŭ lia gasto devos doni konton al tute aliaj homoj, kaj ke verŝajne tiu kadavro falos en manojn, el kiuj nenia gastejestro povos ĝin eltiri; li decidis provi finaranĝi almenaŭ ĉi-lastan negoc-aferon.

«Vi estas bona knabo, honestulo; ĉu ne?» li diris.

«Bona knabo, honestulo», respondis Renzo, plu batalante per la fingroj kun la butonoj de l' vestaĵoj, kiujn li ankoraŭ ne sukcesis demeti.

«Bone», respondis la gastejestro: «elpagu do nun tiun ŝuldeton, ĉar morgaŭ mi devas eliri por iuj aferoj miaj...».

«Tio ĉi estas prava», diris Renzo. «Mi estas ruza, sed honesta... Sed kie la mono? Kiel serĉi nun la monon?».

«Jen ĝi ĉi tie», diris la gastejestro: kaj, aplikante sian tutan sperton, sian tutan paciencon, sian tutan lerton, li sukcesis kalkuli kun Renzo la ŝuldon, kaj havigi al si ties pagon.

«Gastejestro, donu al mi helpan manon, ke mi povu fin-demeti la vestaĵojn», diris Renzo. «Eĉ mi mem vidas, nu, ke mi havas grandan dormemon».

⁵ *kadavro*: t.e. la mono.

La gastejestro donis al li la petitan helpon; aldone li etendis sur lin la lit-kovrilon, kaj al li diris malafable «bonan nokton», kiam tiu jam ronkis. Poste, pro tiu speco de allogo, kiu foje instigas observi objekton de kolero, samkiel de am-sento, kaj kiu eble nenio estas, krom deziro ekkoni tion kio forte influas nian animon, li momente restis, por kontempli sian ĝenaĉan gaston, levante la lampon super lia vizaĝo, kaj per streĉita mano reflektigante sur lin la lumon; proksimume simile al la gesto, laŭ kiu pentristoj bildigas Psiĥon⁶ gvatanta la formojn de l' nekonata edzo. «Azenaĉo!» li diris en sia menso al la povra dormanto: «ĉi-malfeliĉon serĉis vi mem. Kaj morgaŭ vi al mi diros, kian plezuron el tio vi havas. Sentaŭguloj, volantaj travojaĝi la mondon, ne sciante kiu-flanke leviĝas la suno; por impliki kaj vin mem, kaj proksimumojn».

Tion dirinte aŭ pensinte, li retiris la lampon, moviĝis, eliris de la ĉambro, kaj ŝlisis la pordon. Sur la ŝtupar-placeto, li vokis la gastejestrinon; al kiu li ordonis lasi al servistineto la infanojn por varti, kaj ŝi mem desupri en la kuirejon anstataŭ li. «Mi bezonas eliri pro fremdulo, kiu trafis ĉi tien, mi ne scias diable kiel, por mia malfeliĉo», li aldonis; kaj li al ŝi resume rakontis la ĝenan okazintaĵon. Kaj poste li plu aldonis: «okulon al ĉio; kaj ĉefe singardon, en ĉi tia malbena tago. Ni havas tie malsupre araĉon da misfaruloj, kiuj, kaj pro drinkado, kaj pro tio, ke ili estas nature trivialaj, eldiras ĉiaspecajn fiaĵojn. Sufiĉe; se ia temerarulo...».

«Ho! Mi ne estas knabineto, kaj mi mem scias, kion fari.

⁶ *Psiĥon*: mitologian inon, kiu edziniĝis kun dio Eroso, kondiĉe ke neniam ŝi rigardu ties vizaĝon. Ĉar ŝi la kondiĉon malobservis, kaj nokte kaŝ-rigardis lin ĉe lamp-lumo, la edzo malaperis.

Ĝis nun, al mi ŝajnas, ke ne eblas diri...».

«Bone, bone; kaj viglu, ke oni pagu; kaj koncerne ĉiujn parolojn de ili diratajn pri proviantestro kaj guberniestro kaj Ferrer kaj dekestroj kaj kavaliroj kaj Hispanujo kaj Francujo kaj similaj stultaĵoj, ŝajnigu ne aŭdi; ĉar, se kontraŭdiri, oni povus trafi en malfeliĉon tuj; kaj se pravigi, oni povus suferi estonte: kaj vi mem scias, ke foje la homoj dirantaj plej grandajn enormaĵojn...⁷ Sufiĉe; se aŭdi certajn eldirojn, deturnu la kapon, kaj diru: tuj mi venas, kvazaŭ oni vokus vin ali-loken. Mi klopodos reveni kiel eble plej baldaŭ».

Tion dirinte, li desupris kun ŝi en la kuirejon, li ĉirkaŭrigardis, ĉu rimarkindas io nova; li dekroĉis de najlego ĉapelon kaj mantelon, li prenis el angulo bat-bastonon, li resumis, per alia okulumo al la edzino, la dicitajn instrukciojn; kaj li eliris. Sed jam dum tiuj operacoj, li rekaptis la fadenon de la apostrofo⁸ komencita ĉe la lito de la povra Renzo; kaj li daŭrigis ĝin, marŝante surstrate.

– Ŝton-kapa montarano! – Ĉar, kvankam Renzo strebis tion kaŝi, lia montaraneco evidentiĝis per si mem, el liaj vortoj, prononco, aspekto kaj far-manieroj. – El tago ĉi tia, mi elturniĝus sendifekta, per diplomateco, per prudento; kial do veni vi mem fuŝi mian aferon tag-fine? Ĉu mankas en Milano da gastejoj, tiel ke vi trafu ĝuste en la mian? Se almenaŭ venus vi sola; tiam mi fermetus okulon, por ĉi-vespero; kaj morgaŭ matene mi al vi komprenigus la pravon. Sed tute ne; akompanate vi venas; kaj akompanate de sbiro, por efiki pli trafe! –

Ĉiupaŝe la gastejestro renkontis aŭ izolajn pasantojn, aŭ

⁷ *homoj dirantaj plej grandajn enormaĵojn...*: estas spionoj.

⁸ *apostrofo*: retorika alparolo direktata al forestanta persono.

hom-parojn, aŭ grupetojn vagantaj frustrante. Ĉi-punkte de sia muta alparolo, li vidis veni soldat-patrolon; kaj flankiĝante, por lasi ilin pasi, li rigardis ilin flank-okule, kaj li daŭrigis en si mem: – Jen do la punistoj. Kaj vi, azenaĉo, pro tio ke vi vidis vagi kelke da bruantaj homoj, vi enkapigis al vi la konvinkon, ke la mondo ŝanĝiĝas. Kaj sur tiu ĉi bela bazo, vi ruinigis vin, kaj vi volus ruinigi eĉ min mem; kio estas maljustaĵo. Mi ĉion klopodis por vin savi; kaj vi, bestaĉo, kompense, preskaŭ renversis mian tutan gastejon. Nun vi mem devos elturni vin: pri mi, zorgas mi mem. Kvazaŭ mi volus ekscii vian nomon pro mia scivolo! Kial do interesus min, ĉu vi nomiĝas Taddeo aŭ Bartolomeo? Ne eĉ min mem amuzas preni la plumon! Sed vi ne estas la solaj homoj, kiuj volus ke la aferoj iru laŭplaĉe. Ankaŭ mi mem scias, ke iuj kriaĵoj estas senvaloraj: ja bela novaĵo, kian al ni alportu montarano! Sed vi ne scias, ke la kriaĵoj kontraŭ gastejestroj ja validas. Kaj vi pretendas travagi la mondon, kaj babili; kaj vi ne scias ke, se voli kondukti laŭplaĉe, kaj prifajfi kriaĵojn, la unua necesa rimedo estas paroli pri ili respekteme. Kaj por povra gastejestro, eventuale samopinia kun vi, kiu ne demandas la nomon de l' homo, kiu venas klienti ĉe li, ĉu vi scias, bestaĉo, kia bela sankcio estas fiksita? *Sub monpuno, kontraŭ chiu ajn el menciitaj gastejestroj, tavernestroj kaj ceteraj, kiel supre, de tri cent eskudoj: jes, jen tie la tri cent subkovataj eskudoj; kaj elspezotaj tiel bele; destinotaj du-trione al regha Trezorejo, kaj unu-trione al akuzinto au denunciinto: tiu bela ulo! Kaj kaze de ne-poveco, kvin jarojn sur galero, kaj ech pli granda mona au korpa puno, lau-arbitre de lia ekscelenco.* Tre dankema pro via indulgemo. –

Ĉe tiuj ĉi vortoj, la gastejestro atingis la sojlon de la

justicejo.

Tie, kiel en ĉiuj ceteraj burooj, estis multege por fari: ĉie oni zorgis doni la ordonojn taksatajn plej taŭge preventaj por la morgaŭa tago, por forigi pretekstojn kaj aŭdacon el la animoj strebantaj al novaj tumultoj, kaj plifirmigi la forton en la manoj kutimaj apliki ĝin. Oni plimultigis la soldataron ĉe la domo de l' proviantestro; la elirejoj de la strato estis baritaj per traboj, barikaditaj per ĉaroj. Oni ordonis al ĉiuj bakistoj baki panon senintermite; oni sendis kurierojn al la ĉirkaŭaj lokoj, kun ordonoj venigi tritikon al la urbo; por ĉiu bakejo oni komisiis nobelojn aliri fru-matene kontroli la pan-disdonadon kaj bremsi la agitemulojn, per la prestiĝo de sia ĉeesto kaj per bonaj vortoj. Sed por bati, laŭproverbe, samtempe barel-ringon kaj barel-ventron, kaj igi la konsilojn pli efikaj per iom da teroro, oni elpensis eltrovi la manieron kapti kelke da ribeluloj: kaj tiu ĉi tasko koncernis precipe la justic-kapitanon; kaj ĉiu povas facile imagi liajn sentojn rilate ribelojn kaj ribelantojn, dum li tenis kompreson⁹ kun vundo-flega akvo sur unu el la organoj de la metafizika profundaĵo. Liaj spurhundoj estis surkampe ek de la komenco de la tumulto: kaj tiu sin diranta Ambrogio Fusella estis, kiel diris la gastejestro, kamuflita sbiro, dissendita ĝuste por surprizi ĉe misfaro kelkiun rekoneblan, kaj lin observi, kaj embuske gvati, kaj kapti pli poste, kiam la nokto estos jam tute kvietaj, aŭ la postan tagon. Aŭdinte kvar vortojn el la prediko de Renzo, li tuj celis al li, pro tio ke li ŝajnis bonmora kulpulo, ĝuste laŭbezone. Kaj konstatante lin tute sensperta pri la urbo, li provis la majstran artifikon konduki lin, tute freŝan, al la malliberejo, kvazaŭ al plej sekura gastejo; sed la afero fiaskis,

⁹ *kompreson*: plurfoje faldita tolo, por meti sur vundo.

kiel vi vidis. Li tamen sukcesis porti hejmen certan sciigon pri la antaŭnomo, nomo kaj deven-loko, krom cent aliaj belaj konjektaj sciigoj; tiel ke, kiam la gastejestro tien venis dirition, kion li scias pri Renzo, oni jam sciis pli multe ol li. Li eniris la kutiman ĉambron, kaj faris sian depozicion: kiamaniere venis pasloĝi ĉe li fremdulo, kiu tute ne volis malkaŝi sian nomon.

«Sciigi la justicon, estis laŭdeva faro», diris la kriminala notario, demetante la plumon, «sed tion ni jam sciis».

– Ja bela sekreto! – pensis la gastejestro: – tio postulas grandan talenton! –

«Kaj ni scias», daŭrigis la notario, «ankaŭ tiun respektindan nomon».

– Diable! Eĉ la nomon: kiel oni sukcesis? – pensis ĉi-foje la gastejestro.

«Sed vi», reparolis la alia kun serioza mieno, «vi ne diras ĉion sincere».

«Kion plian mi diru?».

«Ha! ha! ni tute scias, ke tiu homo alportis en vian gastejon iun kvanton el la pano ŝtelita, kaj ŝtelita perforte, per rabado kaj ribelo».

«Eniras homo kun panbulo enpoŝe; ĉu mi tute sciu kie li ĝin prenis. Ĉar, se paroli sincere kiel en mort-momento, mi vidis ĉe li nur unu pan-bulon».

«Jes ja, ĉiam senkulpigi, ĉiam pledi: se aŭskulti homojn kia vi, ĉiuj estas honestuloj. Kiel vi povas pruvi, ke tiu pano estis honeste aĉetita?».

«Kion mi devus pruvi? tio ne min koncernas: mi gastejstras».

«Vi tamen ne povos malkonfirmi, ke tiu via kliento

aŭdakis eldiri vortojn insultajn kontraŭ la kriaĵojn, kaj fari malicajn kaj ne-decajn agojn kontraŭ la blazonon de lia ekscelenco».

«Indulgu min, via moŝto: kiel li povas esti mia kliento, se mi lin vidas unuafoje? La diablo mem, mi respekteme tion diru, sendis lin al mia hejmo: kaj se mi lin konus, via moŝto ja komprenas, ke mi ne bezonus demandi lian nomon».

«Tamen, en via gastejo, je via ĉeesto, oni diris fajrajn aferojn: temerarajn vortojn, ribelajn propoziciojn, murmurojn, kriegojn, bruadojn».

«Kiel via moŝto postulu, ke mi prientenu la stultaĵojn, kiujn povas diri tiom da kriegantoj, parolantaj ĉiuj kune? Mi, kiel povrulo, devas prizorgi miajn negocojn. Kaj krome via moŝto ja scias, ke homoj kun facila lango kutime estas ankaŭ facila-manaj, des pli kiam ili estas arope, kaj...».

«Jes, jes; lasu ilin kaj fari kaj diri: morgaŭ, morgaŭ vi vidos, ĉu forpasis ilia kaprico. Kion vi kredas?». «Mi kredas nenion».

«Ĉu ke la kanajlaro ekmastris Milanon?».

«Ho ĝuste!».

«Vi vidos, vi vidos».

«Mi tute komprenas: reĝo ĉiam reĝados; sed eventuala batito restos batita: kaj kompreneble povra famiĉestro tute ne emas batiĝi. Vi, sinjoroj, havas la forton; al vi, sinjoroj, apartenas la tasko».

«Ĉu vi havas ĉe vi ankoraŭ multe da homoj?».

«Nekalkuleble».

«Kaj kion faras tiu via kliento? Ĉu li daŭrigas kriaĉi, eksciti homojn, prepari tumultojn por morgaŭ?».

«Tiu fremdulo, intencas diri via moŝto: li enlitiĝis».

«Vi do havas tie multe da homoj... Sufiĉe; zorgu ne lasi lin eskapi».

– Ĉu mi sbiru? – pensis la drinkejestro; sed li respondis nek jes nek ne.

«Vi ja revenu hejmen; kaj vi prudentu», reparolis la notario.

«Ĉiam mi prudentis. Via moŝto ja povas diri, ĉu mi iam ajn havis koncernon kun la justico».

«Kaj vi ne kredu, ke la justico perdis sian forton».

«Ĉu mi? Pro ĉiela amo! mi kredas nenion; mi nur zorgas gastejstri».

«La kutiman kanzonon: nenion alian vi havas por diri».

«Kion alian diri? La vero estas nur unu».

«Sufiĉe; intertempe ni tenas vian depozicion; eventuale vi sciigos pli detale al la justico tion, pri kio oni eventuale vin demand-esploros».

«Pri kio mi sciigu? nenion mi scias; mi apenaŭ havas cerbon, por prizorgi miajn aferojn».

«Zorgu ne lasi lin foriri».

«Espereble la eminentega sinjoro kapitano sciigos, ke tuj mi venis plenumi mian devon. Mi kisas la manojn al via moŝto».

Ĉe l' tagiĝo, Renzo jam de sep horoj ronkadis kaj, kompatinda! ankoraŭ estis en plej profunda dormado, kiam lin vekis du skuegoj ĉe l' brakoj, kaj voĉo el la pied-parto de la lito, krianta: «Lorenzo Tramaglino!». Li rekonsciiĝis, kuntiris la brakojn, penege malfermis la okulojn; kaj li vidis nigre vestitan viron starantan ĉe la pied-parto, kaj du armitojn ĉe ambaŭ flankoj de la lit-kapo. Kaj inter la surprizo, kaj la duonvekiĝo, kaj la kap-doloreto pro la vino, kiun vi scias, li restis

momente kvazaŭ sorĉite; kaj ĉar li taksis, ke li sonĝas, kaj, ĉar tia sonĝo al li ne plaĉis, li baraktis, kvazaŭ por tute vekigi.

«Ha! Ĉu vi aŭdis, fine, Lorenzo Tramaglino? », diris la viro kun nigra mantelo, la sama kriminala notario de l' antaŭa vespero. «Ek do; leviĝu, kaj venu kun ni».

«Ĉu Lorenzo Tramaglino?», diris Renzo Tramaglino: «Kion signifas tio? Kion vi volas je mi? Kiu al vi diris mian nomon?».

«Malpli da babiloj, kaj rapidu», diris unu el la ĝendarmoj starantaj lia-flanke, denove kaptante lian brakon.

«Ho he! kia perforto estas ĉi tia?» kriis Renzo, retirante la brakon. «Gastejestro! ho gastejestro!».

«Ĉu ni forkonduku lin en ĉemizo?» reparolis tiu ĝendarmo, sin turnante al la notario.

«Ĉu vi aŭdis?» diris ĉi-lasto al Renzo: «tion oni faros, se vi ne tuj leviĝas, por veni kun ni».

«Kaj kial?» demandis Renzo.

«La kialon vi ekscios ĉe l' sinjoro justica kapitano».

«Ĉu mi? Mi estas honestulo: mi nenion misfaris; kaj mi miras...».

«Des pli bone por vi, des pli bone; tiele per du vortoj vi elturniĝos, kaj vi rajtos foriri al viaj aferoj».

«Bonvolu delasi min nun», diris Renzo: «mi ne havas koncernon kun la justico».

«Ĉesu do!» diris unu ĝendarmo.

«Ĉu ververe ni forkonduku lin?» diris la alia.

«Lorenzo Tramaglino!» diris la notario.

«Kiel via moŝto scias mian nomon?».

«Vi faru vian devon», diris la notario al la ĝendarmoj; kiuj tuj etendis la manojn sur Renzon, por eltiri lin el la lito.

«He! ne tuŝu la karnon de honestulo, ĉar... mi kapablas min vesti per mi mem».

«Vi do vestu vin rapide», diris la notario.

«Mi vestas min», respondis Renzo; kaj fakte li kolektis ĉi tie kaj tie la vestaĵojn disajn sur la lito, kvazaŭ sur plaĝo restaĵojn de ŝip-rompo. Kaj, komencante sin vesti, li daŭrigis: «Sed mi ne volas iri al la justica kapitano. Mi ne havas koncernon kun li. Ĉar oni al mi malprave faras tian malhonoron, mi volas kondukiĝi al Ferrer. Lin mi konas, mi scias ke li estas honestulo; kaj li estas al mi danko-ŝulda».

«Jes, jes, fileto, oni kondukos vin al Ferrer», respondis la notario. En aliaj situacioj, li ridegus plenĝue pri tia postulo; sed tiam ne estis momento taŭga por ridi. Jam venante, li estis vidinta surstrate ian movadon, ne-difineble, ĉu restaĵo de ribelo ne tute ĉesigita, aŭ komencaĵo de nova: apero de homoj, kuniĝo, grupiĝo, formiĝo de homrondoj. Kaj nune, afektante aŭ almenaŭ klopodante afekti indiferentecon, li orel-streĉis, kaj al li ŝajnis, ke la zumado pli kaj pli laŭtiĝas. Li do deziris elturniĝi rapide; sed li volus forkonduki Renzon kontenta kaj konsenta; ĉar, se malkaŝe konflikti kiam ili estos surstrate, li ne certis, ĉu ili estos tri kontraŭ unu. Tial li okulumis al la ĝendarmoj, ke ili paciencu, kaj ne iritu la junulon; kaj siaflanke li klopodis persvadi lin per afablaj vortoj. Intertempe la junulo, sin vestante tute malrapide, kaj rememorante laŭpove la okazintaĵojn de la hieraŭa tago, li pli-malpli ĝuste divenis, ke kaŭzo de ĉio ĉi nepre estas la kriaĵoj kaj antaŭnomo kaj nomo; sed kiel diable tiu viro eksciis lian nomon? Kaj kio diable okazis tiunokte, tiel ke la justico fariĝis tiel aŭdaca kaj venis celtrafe kapti frumatene unu el la bonaj filetoj, kiuj hieraŭ tiom imponis en la socio? Supozeble ne ĉiuj

tiaj filetoj estis dormantaj, ĉar ankaŭ Renzo sentumis kreskantan zumadon surstrate. Kaj rigardante la vizaĝon de la notario, li ekvidis sur ĝi heziton, kiun tiu sensukcese klopodis kaŝi. Tial, ĉu por konfirmi siajn konjektojn kaj esplori la situacion, ĉu por prokrastumi, kaj ankaŭ por provi elturniĝon, li diris: «mi ja vidas, ke la fonto de ĉio ĉi devenas el la afero pri antaŭnomo kaj nomo. Hieraŭ vespere verdire mi estis iom vin-gaja: tiuj ĉi gastejestroj foje havas perfidajn vinojn; kaj estas ja konate, ke foje la vino, glutite, parolas per si mem. Sed, se temas nur pri ĉi tio, nun mi pretas vin kontentigi. Kaj krome, mian nomon vi jam konas. Kiu diable ĝin diris al vi?». «Brave, fileto, brave!» respondis tute afekte la notario: «mi vidas ke vi havas prudenton; kaj, kreu min, kiu estas fakulo: vi estas pli ruza ol multe da aliaj. Ĝi estas plej bona maniero, por elturniĝi rapide kaj feliĉe: ĉe tiaj bonaj disponoj, per du vortoj vi tuj estos absolvita kaj liberigita. Sed vidu, fileto, min mem ligas devoj, mi ne povas vin lasi libera ĉi tie, kiel mi volus. Nu, rapidu bonvole, kaj venu tute sentime; ĉar, tuj kiam oni vidos, kiu do vi estas; kaj krome mi diros... Lasu al mi la aferon... Sufiĉe, rapidu, fileto».

«Ha! Vi ne povas: mi komprenas», diris Renzo; kaj li plu survestis sin, per gestoj repelante la ĝendarmojn, kiuj provis surmeti al li al manojn, por rapidigi lin.

«Ĉu ni pasos tra la katedrala placo?» li demandis pli poste la notarion.

«Tra kie vi volos; tra plej mallonga vojo, por lasi vin libera kiel eble plej baldaŭ», li diris, ronĝante sin pro tio, ke li devas faligi tiun misteran demandon, kiu povus fariĝi objekto de cent esplor-demandoj. – Kiam oni naskiĝas malfeliĉa! – li pensis. – Jen; trafas en miajn manojn viro, kiu videble nur

volus elbuŝigi; kaj se havi iom da trankvilo, oni lin konfesigus ĉion ajn laŭvole, sen tortura ŝnuro, *extra formam*¹⁰, neoficiale, per amikeca konversacio; viro kiun oni povus konduki en karceron jam demand-esploritan, sen ke li rimarkus tion; kial do tia ulo devus trafi min en tiom turmentata momento. He! estas seneskape, – li plu pensis, streĉante la orelojn, kaj klinante la kapon malantaŭen: – estas senrimede; riskas esti tago pli aĉa ol hieraŭ. – Ĉi tian penson kaŭzis eksterordinara bruo, kiu aŭdiĝis surstrate: kaj li ne povis sin deteni malfermi la ŝutron, por rigardeti. Li vidis, ke temas pri grupo da civitanoj, kiuj, ĉe l' ordonego disiĝi, eldirita de patrolo, unue respondis per insultaj vortoj, kaj fine komencis disiĝi, plu grumblante; kaj tio, kio al la notario ŝajnis morto-signo: la soldatoj estis tute afablaj. Li fermis la ŝutron, kaj restis momente hezita, ĉu konvenas finplenumi sian aferon, aŭ lasi Renzon gardata de l' du ĝendarmoj, kaj rapidi al la justica kapitano, por sciigi pri la okazantaĵo. – Sed, – li tuj ekpensis – oni diros min sentaŭgulo, malbravulo, kaj ke mi estus devinta plenumi la ordonojn. Estante en danc-rondo, oni devas pludanci. Damnita urĝeco! Malbenata metio! –

Renzo estis leviĝinta; la du sbiroj staris ambaŭflanke. La notario al ili gestis ne tro perforti, kaj diris al li: «kiel bona knabo; al ni, rapidu».

Ankaŭ Renzo aŭdis, vidis kaj pensis. Li jam estis tute vestita, escepte de la jako, kiun li tenis per unu mano, dum per la alia li palpserĉis en la poŝoj. «Ho he!» li diris, rigardante la notarion, kun tute esprimiva mieno: «ĉi tie kuŝis mono kaj letero. Mia sinjoro!». «Oni ĉion al vi redonos akurate», diris la notario, «post plenumo de l' nemultaj formalajĵoj. Ni ekiru,

¹⁰ *extra formam*: latine = sen formalajĵoj.

ekiru».

«Ne, ne, ne», diris Renzo, balancante la kapon: «ĉi tio al mi ne plaĉas: mi volas mian havaĵon, mia sinjoro. Mi donos konton pri miaj agoj; sed mi volas mian havaĵon».

«Mi volas al vi pruvi, ke mi fidas je vi: tenu, kaj rapidu», diris la notario, eligante el la sino, kaj kun suspiro redonante al Renzo la konfiskaĵon. Ĉi-lasto, remetante ĝin sia-loken, murmuris interdente: «distance! tiom multe vi frekventas ŝtelistojn, ke vi lernetis ilian metion». La ĝendarmoj ne plu eltenis; sed la notario ilin bremsis per okulumoj, kaj dume li diris en si mem: – Se fine vi metos piedon trans tiu sojlo, vi nepre pagos ĝin uzure, vi nepre pagos. –

Dum Renzo surmetis la jakon, kaj prenis la ĉapelon, la notario ordon-gestis al unu el la ĝendarmoj antaŭiri tra la ŝtuparo; poste li sendis la kaptiton, kaj liadorse la duan amikon; kaj fine ekiris ankaŭ li mem. Kiam ili atingis la kuirejon, dum Renzo diras: «Kien do sin enŝovis tiu benata gastejestro?» la notario faras alian geston al la ĝendarmoj; kiuj kaptegas, unu la dekstran kaj dua la maldekstran manon de la junulo, kaj tute rapide ligas ties manartikojn per iaj aparatoj, nomitaj, per hipokrita stilfiguro de eŭfemismo¹¹, manumoj. Ĉi tiuj konsistis (ni bedaŭras devi desupri al detaloj malindaj je historia seriozo; sed klareco tion postulas) konsistis el ŝnureto iom pli longa ol ĉirkaŭo de ordinara manartiko, kun ĉe la ekstremaĵoj du ligneroj, kvazaŭ du stangetoj. La ŝnureto ĉirkaŭligis la manartikon de l' paciento; la ligneroj, tenate inter la longa kaj la ringa fingro de l' kaptinto, restis en ties pugno, tiel ke li, tordante ilin, povis streĉi la ligan laŭvole; kaj

¹¹ *eŭfemismo*: bontonaj vortoj por esprimi krudajn aŭ maldecajn aferojn.

per tio li povis ne nur sekurigi la kapton, sed eĉ torturi eventualan rezistanton: kaj ĉi-cele la ŝnureto estis garnita per pluraj nodoj.

Renzo baraktas, krias: «Kia perfido estas ĉi tia? Al honestulo...!». Sed la notario, kiu por ĉiu ajn aĉa kazo havis trafajn bonajn vortojn, «vi paciencu», li diris: «ili faras sian devon. Kio do? estas nur formalajoj; ankaŭ ni mem ne rajtas trakti homojn laŭ nia kor-sento. Se ne fari kiel ordonite, ve al ni, pli aĉe ol al vi. Vi paciencu».

Dum li parolis, la du homoj kiuj havis tiun devon, ektordis la lignerojn. Renzo kvietiĝis, kvazaŭ furioza ĉevalo, kiu sensas la lipon tordita per la brid-mordaĵo, kaj elkriis: «paciencon!». «Brave, fileto!» diris la notario: «ĉi tia estas la vera maniero por elturniĝi glate. Kion fari? Tio ĉi estas ĝeno; ankaŭ mi mem konscias tion; sed, se bone konduiti, post momento vi estos for. Kaj ĉar mi vidas vin bon-dispona, kaj mi sentas min inklina helpi vin, mi volas doni al vi alian konsilon, por via bono. KREDU min, kiu spertas pri aferoj ĉi tiaj: formarŝu tute rekte, rigardante nek tien nek ĉi tien, tiel ke oni ne ekvidu vin: tiele neniu atentis vin, neniu rimarkas, kaj vi gardas vian honoron. Post unu horo vi estos libera: ili havas tiom da aferoj por fari, ke ili mem havos urĝon ellasi vin: kaj krome, mi mem parolos... Vi foriros por viaj aferoj; kaj tute neniu scios, ke vi estis en la manoj de la justico. Kaj vi», li aldonis, sin turnante sever-miene al la ĝendarmoj: «vi tute evitu fari al li malbonon, ĉar mi mem protektas lin; vian devon vi ja devas fari; sed vi memoru, ke li estas honestulo, civila junulo, kiu post malmulte estos libera; kaj ke por li nepre gravas lia honoro. Vi marŝu tiamaniere, ke neniu rimarku ion ajn: kvazaŭ vi estus tri promenantaj honestuloj». Kaj, kun

ordona tono kaj minaca brovo, li konkludis: «Vi min komprenis». Pli poste, sin turninte al Renzo, kun malstreĉita brovo, kaj kun mieno subite rideta, kiu ŝajnis diri: ho, ververe ni estas amikoj!, li denove al li flustris: «prudentu; agu laŭ mia konsilo: marŝu sendistre kaj kviete; fidu homon, kiu amas vin: ni iru». Kaj la societo ekiris.

Sed Renzo ekkredis eĉ ne unu el tiom da belaj vortoj: nek ke la notario amas lin pli ol la ĝendarmojn, nek ke li tiom zorgas por lia honoro, nek ke li intencas helpi al li: li tute komprenis ke la honestulo, timante ke surstrate estiĝus oportuno por eskapi el liaj manoj, pretekstas tiujn belajn motivojn, por deturni Renzon, tiel ke li ne atentu kaj ne elprofitu. Tiel ke ĉiuj admonoj neniom efikis, krom konfirmi lin ĉe la plano, kiun li jam havis en la kapo, fari tute male.

Neniu el tio konkludu, ke la notario estis sensperta kaj novica ruzulo; ĉar tio estus eraro. Li estis eĉ plej sperta ruzulo, diras nia historiisto, kiu laŭŝajne estis lia amiko: sed en tiu momento li estis tre ekscitita. Vi certu ke, frid-sange, li tute primokus homon, se vidi lin fari tion, kion nun li mem faras: por instigi onin fari ion en si mem suspektindan, malkaŝe kaj varmege tion sugesti, ridinde afektante, ke li donas senprofitan, amikecan konsilon. Sed estas ĝenerala inklinado de la homoj, se ili estas ekscititaj kaj ansiaj, kaj vidas, kion povus fari aliulo por ilin malimpliki: tion petegi insiste kaj ripete, ĉia-pretekste; kaj ankaŭ la ruzuloj, se ekscititaj kaj ansiaj, falas sub tiun ĉi komunan leĝon. Ĝuste pro tio plejofte ili en similaj cirkonstancoj aspektas tiel ridinde. Tiujn majstrajn eltrovaĵojn, tiujn belajn malicaĵojn, per kiuj ili kutimas supergajni, kaj kiuj fariĝis kvazaŭ ilia dua naturo, kaj kiuj, aplikite siatempe, kaj uzate kun la necesaj anima

trankvilo kaj mensa sereno, efikas tiel trafe kaj tiel kaŝe, kaj eĉ malkaŝite post la sukceso, ricevas ĉies aplaŭdon; tiujn samajn rimedojn la kompatindaj, se eldevigite, aplikas haste, freneze, sen stilo nek bontono. Tiel ke, se vidi ilin tiamaniere cerbumi kaj barakti, ili estigas kompaton kaj mok-ridojn, kaj eĉ la homo, kiun ili volus mistifiki, kvankam malpli sagaca ol ili, tute malkovras ilian ludon, kaj el tiaj artifikoj eltiras lumon por si, kontraŭ ili. Tial oni neniam sufiĉe rekomendu al la profesiaj ruzuloj ĉiam gardi fridan sangon, aŭ, afero plej sekura, esti ĉiam pli fortikaj.

Renzo do, tuj kiam ili estis surstrate, komencis turni l' okulojn ĉi tien kaj tien, elklini sin per la tuta korpo dekstren kaj malen, streĉi l' orelojn. Tamen ne ĉeestis eksterordinara homamaso; kaj kvankam sur la mieno de pli ol unu pasanto oni facile divenis mi ne scias kion ribeleman, ĉiu tamen pluiris sian vojon; kaj vera insurekcio ne estis.

«Prudenton, prudenton!» al li dorsen flustris la notario: «vian honoron; la honoron, fileto». Sed kiam Renzo, priatentante tri homojn venantajn kun ardaĵ vizaĝoj, aŭdis ke ili parolas pri bakejo, pri kaŝita faruno, pri justeco, siaflanke li komencis gesti al ili per la vizaĝo, kaj tusi laŭ maniero indikanta tute alian aferon ol malvarmumon. Tiuj ekrigardis pli atente la irantan kvaropon, kaj ekhaltis; kun ili haltetis aliaj alvenantoj; aliaj, jam preteririntaj, ĉe l' flustrado sin turnis kaj revenis, formante hom-vicon.

«Gardu vin; prudenton, fileto; des pli aĉe por vi, vidu; ne fuŝu vian aferon; la honoron, la reputacion», plu flustris la notario. Sed Renzo kondukis eĉ pli aĉe. La ĝendarmoj, post okuluma interkonsulto, taksante fari ion bonan (ĉia homo estas erar-pova), ek-streĉis la manumojn.

«Aj! aj! aj!» krias la turmentato: ĉe l' krio, amasiĝas homoj; da ili alvenas el ĉiu strat-flanko: la kvaropo estas blokita. «Li estas malbonfarulo», flustris la notario al la alpremiĝantoj: «li estas ŝtelisto surprizita ĉe l' misfaro. Retiriĝu bonvole, lasu lokon al la justico». Sed Renzo, ekvidinte la oportunon, kaj la ĝendarmojn blankiĝi, aŭ almenaŭ paliĝi, – Se mi ne helpas min nun, – li ekpensis, – ve al mi! – Kaj tuj li laŭtigis la voĉon: «knaboj! oni mi kondukas en malliberejon, ĉar hieraŭ mi kriis: panon kaj justecon. Nenion mi faris; mi estas honestulo: helpu min, ne forlasu min, knaboj!». Favora murmuro, kaj pli klaraj pled-voĉoj leviĝas responde: la ĝendarmoj unue ordonas, poste petas, poste petegas la plej najbarajn foriri, lasi spacon: la homamaso male pli kaj pli urĝas kaj premas. Tiuj, vidinte la riskan situacion, lasas la manumojn, kaj nenion zorgas krom enmiksiĝi en la homamason, por eskapi ne vidate. La notario arde sopiris fari la samon; sed kaŭzis al li malfeliĉon lia nigra mantelo. La povrulo, pala kaj konsternita, klopodis naniĝi, li tordiĝis, por elgliti el la homamaso; sed li ne povis levi la rigardon, sen vidi dudekon da okuloj turnitaj al li. Li elserĉis ĉiajn manierojn, por afekti sin fremdulo, kiu pasante hazarde, troviĝas meze de interpuŝiĝo, kiel pajlereto en glacio; kaj renkontiĝante vizaĝ-al-vizaĝe kun viro, kiu lin fiks-rigardis en maniero pli aĉa ol aliaj, li, afektante per la buŝo rideton, kun ia stulta sinteno, lin demandis: «Kio estis?». «Hu, korvaĉo!» respondis li. «Korvaĉo! korvaĉo!» reeĥis ĉirkaŭe. Al krioj aldoniĝis puŝegoj; tiel ke, post nemulte, parte per siaj kruroj kaj parte per alies kubutoj, li sukcesis tion, kion li pleje deziregis en tiu momento: eliri el tia kunpuŝiĝo.

XVI

«Forkuru, forkuru, honestulo: jen ĉi tie monakejo, jen tie preĝejo; tra tie, tra ĉi tie», oni krias al Renzo ĉiuflanke. Koncerne forkuron, vi imagu, ĉu li bezonis konsilojn. Ek de kiam aperis en lia menso la espero elturniĝi el tiaj ungegoj, li komencis pripensi, kaj decidis ke, se tion li povos, li ne haltos, ĝis li estos ekstere ne nur de la urbo, sed eĉ de la duklando. – Ĉar – li pensis – mian nomon ili havas sur siaj libraĉoj, kiel ajn ili ekhavis ĝin; kaj per la antaŭnomo kaj nomo, ili povas veni kapti min kiam ajn. – Koncerne azilon, li enŝovos sin tien, nur se havi la ĝendarmojn ĉe l' dorso. – Ĉar, se mi povas esti arbar-birdo, – li plu pensis, – mi ne volas fariĝi kaĝo-birdo. – Li do planis sia rifuĝejo tiun vilaĝon en la Bergama teritorio, kien almigris tiu kuzo Bortolo, se vi memoras, kiu jam plurfoje invitis lin tien. Sed kiel trovi la ĝustan vojon, jen la malfacilo. Liberigite en nekonata parto de preskaŭ nekonata urbo, Renzo eĉ ne sciis tra kiu pordego eliri, por celi al Bergamo; kaj eĉ se li konus ĝin, li ne sciis kiel la pordegon atingi. Unue li ekpensis pridemandi unu el liaj liberigintoj; sed ĉar en la tempeto, kiun li havis por pripensi siajn okazaĵojn, trafis lian kapon strangaj ideoj pri tiu tia komplezema glavofaristo, patro de kvar filetoj, li por sekureco ne volis malkaŝi siajn planojn al vasta societo, kie povus troviĝi alia tiu-speca; kaj tuj li decidis malproksimiĝi rapide de tie: pri la vojo li demandos pli poste, en loko kie neniu scias, kiu do li estas, nek kial li tion demandas. Li diris al liaj liberigintoj: «dankegon, knaboj: estu benataj», kaj, eskapante tra la spaco, kiun oni tuj al li disponigis, li elanis, kaj for; enen en strateton, malsupren tra vojeto, li longe galopis, ne sciante kien. Kiam li taksis sin sufiĉe fora, li malrapidigis la paŝadon, por ne

suspektigi; kaj li komencis disrigardi, por elekti la homon, al kiu sian demandon adresi: fidindan vizaĝon. Sed ankaŭ ĉe tio estis impliko. La demando estis per si mem suspektinda; la tempo urĝis; la ĝendarmoj, apenaŭ liberiĝinte el tiu impliketo, certe spuras la eskapinton; la onidiro pri tiu eskapo eble jam atingis ĝis tie; kaj ĉe tiaj urĝoj, Renzo devis fari eble dek fiziognomikajn¹ analizojn, antaŭ ol trovi la figuron, kiu al li ŝajnis taŭga. Tiu gras-rondeta ulo, kiu staris ĉe l' sojlo de sia butiko, kun disaj kruroj kaj ĉe-dorsaj manoj, kun elstara ventro, kaj la mentono supren, de kie pendis granda gorĝego, kaj kiu, havante nenion por fari, alterne levis sian treman mason piedpinten, lasante ĝin fali kalkanen, havis aspekton de scivola klaĉulo, kiu faros demandojn anstataŭ doni respondojn. Tiu alia, alvenanta kun fiksaj okuloj kaj elstara lipo, anstataŭ rapide kaj trafe indiki la vojon al aliulo, aspektis koni apenaŭ la sian. Tiu granda knabo, kiu verdire ŝajnis tre vigla, aspektis tamen eĉ pli malica; kaj verŝajne lin amuzegus irigi povran kamparanon en direkton malan ol la deziratan. Ĉar estas ja vere, ke al embarasito preskaŭ ĉio kaŭzas novan embarason! Vidinte fine homon venantan rapide, li ekpensis ke ĉi tiu, absorbite verŝajne de urĝa afero, tuj respondos, sen pliaj babiloj; kaj aŭdante ke li parolas kun si mem, li taksis lin certe sincera. Li proksimiĝis, kaj al li diris: «Bonvolu, sinjoro: kien sin direkti, por iri al Bergamo?».

«Ĉu por iri al Bergamo? Tra Orienta pordego».

«Dankegon; kaj kien, por atingi Orientan pordegon?».

«Eniru tiun ĉi maldekstran straton; vi atingos la katedralan placon; de tie...».

¹ fiziognomiko estas arto difini karakteron de oni surbaze de ties vizaĝaj trajtoj.

«Sufiĉe, sinjoro; la ceteron mi konas. Dio al vi repagu laŭmerite». Kaj tuj li ekiris laŭ la direkto al li indikita. La alia viro rigardis momente post lin, kaj kunmetante en sia penso tian irmanieron kun lia demando, li diris al si: – Aŭ li mem faris aĉaĵon, aŭ alia homo intencas fari ĝin al li. –

Renzo atingas la katedralan placon; trairas ĝin; preterpasas amason da cindro kaj estingitaj karberoj, kaj li rekonas la restaĵojn de l' brulego, kiun li spektis hieraŭ; li iras flanke de l' katedralaj ŝtupoj, revidas la bakejon de la lambastonoj, duon-detruitan, kaj gardatan de soldatoj; kaj li plu-iras tra la strato, de kie li estis veninta kun la popolamaso; li alvenas al la kapucenejo: li ekrigardas tiun placon kaj la pordon de la preĝejo, kaj li diras al si mem, suspirante: – Ja bonan konsilon al mi donis hieraŭ tiu frato: ke mi restu atende en la preĝejo, farante piaĵon.

Ĉi tie, haltinte momente, por atente rigardi la urban pordegon, tra kiu li devus pasi, li vidis de malproksime multe da gardo-starantoj, kaj pro tio ke li havis iom ekscititan fantazion (oni lin kompatu, ĉar li havis motivojn por tio), li eksentis malinklinon alfronti tiun elpaŝon. Li havis tute proksiman azilon, kie, per tiu letero, li estus taŭge rekomendota; li sentis fortan tenton eniri. Sed li tuj rekonsciiĝis kaj pensis: – Arbar-birdo, dum tio eblas. Kiu min konas? La ĝendarmoj certe ne disdividis sin, por iri atendi min ĉe ĉiu pordego. – Li retrorigardis, por vidi, ĉu eventuale ili venas tiuflanke: li vidis nek ilin, nek aliajn, kiuj aspektus zorgi pri li. Li pluiras; li malrapidigas tiujn benatajn krurojn, kiuj volus plu kuri, dum konvenas nur marŝi; kaj tute malrapide, fajfante mallaŭte, li atingas la pordegon.

Ĉeestis, ĝuste ĉe l' pasejo, amaso da akcizistoj, kaj ankaŭ

hispanaj soldatoj por helpo; sed ĉiuj atentis eksteren, por fortenti la homojn, kiuj ĉe l' sciigo pri ribelo alrapidis, kiel korvoj al la kampo, kie okazis batalo; tiel ke Renzo, kun indiferenta mieno, kun mallevitaj okuloj, kaj irmaniero inter vojaĝa kaj promena, eliris, sen ke oni ion al li dirus; sed liainterne la koro bategis. Vidante dekstre vojeton, tien li ekiris, por eviti la ĉefvojon; kaj li marŝis longe antaŭ ol eĉ retrorigardi.

Li iras kaj iras; li trovas farmejojn, li trovas vilaĝojn, li pluiras ne demandante ties nomojn; li certas ke li foriĝas de Milano, li esperas iri direkte al Bergamo; kaj momente tio al li sufiĉas. De temp' al tempo li retrorigardis; de temp' al tempo li ankaŭ rigardis kaj frotis jen unu jen duan manartikon, ankoraŭ doloretajn, kaj ĉirkaŭsignitajn per ruĝeska strio, postsigno de la ŝnureto. Liajn pensojn konsistigis, kiel ĉiu povas imagi, konfuzaĵo el pento, ekscitiĝo, kolero, tenereco; li penis ordigi en la cerbo siajn hieraŭvesperajn dirojn kaj farojn, malkovri la sekretan parton de sia kompatinda historio, kaj super ĉio, kiel do oni sukcesis ekscii lian nomon. Liaj suspektoj kompreneble koncernis la glavofariston, al kiu, li tute memoris, ke li malsekretigis ĝin. Kaj repensante la manieron, per kiu li eltordis ĝin de li, kaj la tutan konduton de tiu homo, kaj liajn dirojn, kiuj ĉiufoje sukcesis ion ekscii, la suspekto fariĝis preskaŭ certeco. Sed krom tio, li konfuzo rememoris ankaŭ, ke post foriro de l' glavisto li daŭrigis babilaĉi; kun kiu aŭ pri kio, vi divenu do! lia memoro, kiom ajn explore, tion diri ne kapablis: ĝi sciis nur, ke dum tiu tuta tempo ĝi troviĝis ekster-hejme. La kompatinda forperdiĝis en tiu esplorado; li estis kvazaŭ homo, kiu subskribis multe da blankaj paperoj kaj konfidis ilin al ulo, kiun li kredis plej

fidinda honestulo; kaj malkovrante lin trompulo, li volas ekkoni la staton de siaj negoc-aferoj: kion ekkoni? estas ĥaoso. Alia pena klopodo estis plani pri la estonteco ion, kio al li plaĉus: sed ĉiuj ne fantaziaj planoj estis malĝojaj.

Sed baldaŭ lia plej pena klopodo estis trovi la ĝustan vojon. Longe marŝinte laŭhazarde, li ekvidis ke per si mem li ne povas elturniĝi. Li ja malinklinis eligi la nomon Bergamo, kvazaŭ ĝi enhavus ion suspektindan kaj hontindan; sed ne eblis tion eviti. Li do decidis sin turni, kiel li jam faris en Milano, al la unua pasanto, kies fizionomio² al li plaĉos; kaj tion li faris.

«Vi iras misvoje», tiu al li respondis; kaj, post ioma pripenso, li indikis, parte per vortoj kaj parte per gestoj, tra kie do turniĝi, por reatingi la ĉef-vojon. Renzo dankis lin, kaj ŝajnis iri laŭ ties instrukcioj. Fakte li tien sin direktis, sed kun la intenco ja proksimiĝi al tiu benata ĉef-vojo, ne perdi ties videblon, laŭpove marŝi laŭ ties bordo; sed tute ne enpaŝi en ĝin. Sed estis pli facile elpensi tiun intencon, ol praktiki ĝin. La rezulto estis ke, tiel zigzagante dekstren kaj malen, parte sekvante l' aliajn indikojn, kiujn li aŭdacis fiŝkapti ĉi tie kaj tie, parte ilin korektante laŭ sia vidmaniero, kaj adaptante ilin al sia intenco, parte sin allasante al la vojoj sur kiuj li troviĝis, nia fuĝulo jam tramarŝis eble dek du mejlojn, sed distanciĝis de Milano ne pli ol ses; koncerne Bergamon, estis bonŝance, se li ne malproksimiĝis. Li komencis konvinkiĝi, ke ankaŭ tiumaniere li ne taŭgos elturniĝi; kaj li cerbumis pri alia artifiko. Tio kio venis en lian kapon, estis malkovri per ruzaĵo la nomon de landlima vilaĝo alirebla tra ne ĉefa vojo: kaj demandante pri ĝi, li ekkonos la voj-direkton, ne dissemante

² *fizionomio*: la tuto de la vizaĝaj trajtoj kun ilia esprimo.

tiun demandon pri Bergamo, kiu al li ŝajnis odoraĉi forkuron, forpelon, krimecon.

Dum li serĉas la manieron pluki ĉiujn-ĉi sciigojn ne suspektigante, li vidas pendi frondon³ ĉe izola dometo, ekster malgranda vilaĝo. Li jam de longete sentis la bezonon refreŝigi siajn fortojn; li ekpensis, ke tie estos loko taŭga por ambaŭ celoj; kaj li eniris. Ĉeestis nur oldulino, kiu tenis ŝpinbastonon ĉe-flanke kaj ŝpinilon en-mane. Li petis buŝplenon; estis al li proponita iom da mola fromaĝo kaj bongusta vino; la fromaĝon li akceptis, pri vino li fordankis (ĝi fariĝis al li malaminda, pro la embusko, kiun ĝi al li faris la antaŭan vesperon); kaj li sidiĝis, petante la virinon, ke ŝi rapidu. Ŝi rapidege surtabligis; kaj tuj komencis pripafi la gaston per demandoj, kaj pri li mem, kaj pri l' Milanaj eventoj; ĉar la onidiro jam atingis tien. Renzo, ne nur sukcesis tute senĝene ŝirmi sin je la demandoj; sed eĉ elprofitis ilin, utiligante por sia intenco la scivolon de la oldulino, kiu lin demandis, kien li estas direktita.

«Mi devas iri al multe da lokoj», li respondis: «kaj se mi trovos liberan tempeton, mi volas ankaŭ pasi momente tra tiu grandeta vilaĝo, survoje al Bergamo, proksime de la landlimo, tamen en Milano... Kiel ĝi nomiĝas?» – Iu tia ja devas ekzisti, – li dume pensis.

«Gorgonzola, vi intencas diri», respondis la oldulino.

«Gorgonzola!» ripetis Renzo, kvazaŭ por stampi tiun vorton pli profunde en la menson. «Ĉu ĝi malproksimas de ĉi tie?» li reparolis.

«Mi ekzakte ne scias: eble dek, eble dek du mejlojn. Se ĉeestus kelkiu el miaj filoj, li scipovus ĝin diri».

³ *frondo*: branĉo kun folioj, rolanta kiel trinkeja insigno.

«Kaj ĉu vi opinias, ke eblas ĝin atingi tra ĉi-belaj kamparaj vojetoj, evitante la ĉef-vojon? Tie estas tiom da polvo, da polvo! Tiom delonge ne pluvas!». «Al mi ŝajnas ke jes: vi povos tion demandi en la unua vilaĝo, kiun vi trafos, irante dekstren». Kaj ŝi diris ties nomon.

«Bone», diris Renzo; li stariĝis, li prenis pan-pecon, kiu postrestis el la magra manĝo, tute malsaman ol la pano trovita la antaŭan tagon sub la kruco de sankta Dionizio; li pagis la konton, eliris, kaj ekiris dekstren. Kaj por ne vin tedi pli longe ol bezonate, li, de vilaĝo al vilaĝo, kun la nomo de Gorgonzola en-buŝe, atingis ĝin, ĉirkaŭ unu horon antaŭ la vespero.

Dum li ankoraŭ marŝis, li planis fari en Gorgonzola alian halteton, por manĝo iom pli abunda. La korpo ŝatus ankaŭ iom da lit-kuŝo; sed antaŭ ol kontentigi ĝin per tio, Renzo preferus lasi ĝin sveni surstrate. Lia intenco estis, informiĝi en la gastejo pri la distanco de Adda-rivero, lerte ŝtel-kapti informon pri flank-vojeto tien kondukanta, kaj pluri tiu-direkten tuj post la refreŝiĝo. Naskite kaj kreskinte ĉe la dua fonto, se tiel diri, de tiu rivero, li plur-foje aŭdis diri ke, iuloke kaj iom longe, ĝi konsistigas landlimon inter Milanio kaj Venecia respubliko: kie kaj kiom longe, li ne havis precizan ideon; sed tiumomente la plej urĝa afero estis transiri ĝin, kie ajn li troviĝus. Se li ne sukcesos en tiu tago, li rezolutis plu-marŝi ĝis la horo kaj la spir-povo tion ebligos: kaj atendi la tagiĝon en kampo, en dezerto, kie ajn al Dio plaĉos; kondiĉe ke ne en gastejo.

Post kelke da paŝoj tra Gorgonzola, li vidis gastejan insignon, li eniris; kaj al la gastejestro veninta al li renkonte li petis buŝplenon, kaj ankaŭ duon-mezuran pokalon da vino: la

pluaj mejloj, kaj la tempo-paso forigis tiun ekstreman kaj fanatikan malamon kontraŭ vino. «Mi petas ke vi rapidu», li aldonis: «ĉar mi havas urĝon plu vojaĝi». Kaj tion li diris, ne nur ĉar tio veris, sed ankaŭ por eviti ke la drinkejestro, imagante ke li intencas tie tranokti, elpensos demandi pri antaŭnomo kaj nomo, kaj de kie li venas, kaj por kia negoc-afero... For de tio!

La gastejestro respondis, ke li estas tuj servota; kaj Renzo sidiĝis ĉe l' ekstremo de la tablo, proksime de la enirpordo: la loko de l' timemuloj.

Ĉeestis en tiu ĉambro kelke da vilaĝaj neni-faruloj, kiuj jam diskutis kaj komentis la grandajn eventojn okazintajn en Milano hieraŭ, kaj nun malpacienkis ekscii kiel do iris la aferoj hodiaŭ: des pli ke tiuj unuaj sciigoj pli taŭgis por tikli la scivolon, ol por ĝin satigi: ribelo nek subpremita nek venkinta, interrompita per la nokto pli ol ĉesigita; stumpa afero, fino de akto pli ol de dramo. Unu el ili disiĝis el la societo, proksimiĝis al la ĵus veninto, kaj demandis lin, ĉu li venas de Milano.

«Ĉu mi?» respondis Renzo surprizite, por gajni tempon antaŭ ol respondi.

«Ĝuste vi, se la demando estas permesata».

Renzo, balancante la kapon, kunpremante la lipojn, kaj eligante senartikulacian⁴ sonon, diris: «Milano, laŭ tio, kion mi aŭdis... tute ne estas loko, por tien iri en ĉi-momentoj, se ne pro grava neceso».

«Ĉu do daŭras ankaŭ hodiaŭ la tumultego?» demandis pli insiste la scivolulo.

«Por tion ekscii, oni devus troviĝi tie», diris Renzo.

⁴ *senartikulacian*: senvortan.

«Sed ĉu vi ne venas de Milano?».

«Mi venas de Liscate», respondis rapide la junulo, elpensinte intertempe sian respondon. Strikta-sence li venis de tie, ĉar tra tie li pasis, kaj tiun nomon li eksciis survoje, el vojaĝanto, kiu indikis tiun vilaĝon kiel unuan por transiri cele al Gorgonzola.

«Ho!» diris la amiko; kvazaŭ li intencus diri: estus preferinde ke vi venu el Milano, sed paciencon. «Kaj en Liscate, ĉu oni nenion sciis pri Milano?». «Tute povas esti, ke tie oni sciis ion», respondis la montarano, «sed mi nenion aŭdis diri».

Kaj ĉi-lastajn vortojn li eldiris tiamaniere, kvazaŭ li dirus: mi finis. La scivolulo revenis al sia loko; kaj post momento la gastejestro venis surtabligi.

«Kiom distancas de ĉi tie ĝis Adda?» lin demandis Renzo interdente, kun tiu duondorma mieno, kiun ni jam kelkfoje vidis ĉe li.

«Ĉu ĝis Adda por transiri?» diris la drinkejestro.

«Tio estas... jes... ĝis Adda».

«Ĉu vi volas pasi tra l' ponto de Cassano, aŭ sur la pramo⁵ de Canonica?».

«Kie ajn... Mi demandas nur pro scivolo».

«He, mi tion demandis, ĉar temas pri lokoj, kie pasas la honestuloj, la homoj kiuj povas doni praviĝon pri si mem».

«Bone: kaj kiom ĝi distancas?».

«Kalkulu, ke ĉu al la unua, ĉu al la dua, la distanco estas pli-malpli ses mejloj».

«Ĉu ses mejloj! Mi ne ĝin imagis tiom longa», diris Renzo. «Kaj supozeble», li reparolis, kun eĉ afekta

⁵ *pramo*: granda platboato.

indiferenteco, «supozeble, se oni bezonus ŝpar-vojon, ĉu estus aliaj lokoj, por transiri?». «Ja estas da ili tutcerte», respondis la gastejestro, fiksante en lian vizaĝon du okulojn plenajn de malica scivolo. Tio sufiĉis, por estingi inter liaj dentoj la aliajn demandojn, kiujn li jam preparis. Li tiris antaŭ sin la teleron; kaj rigardante la duon-mezuran pokalon, kiun la gastejestro estis surtabliginta kune kun ĝi, li diris: «Ĉu la vino estas pura?».

«Kiel oro», diris la gastejestro: «vi povas pridemandi la tutan popolon de l' vilaĝo kaj ĉirkaŭlokoj, kiu pri ĝi kompetentas: kaj vi mem povos konstati». Kaj tion dirinte, li revenis al la societo.

– Malbenataj gastejestroj! – elkriis Renzo en si mem: – ju pli multe da ili mi ekkonas, des pli aĉaj mi ilin trovas. – Malgraŭ tio, li ekmanĝis grand-apetite, kaj dumtempe li streĉis la orelojn, afektante indiferentecon, por esplori la situacion, kaj konstati, kion do oni opinias tie pri la granda okazintaĵo, en kiu li ludis ne bagatelan rolon, kaj precipe rimarki, ĉu inter tiuj parolantoj estas honestulo, kiun povra knabo povus fideme demandi pri voj-direkto, ne timante, ke oni lin urĝos kaj devigos babili pri siaj aferoj.

«Ba!» diris unu: «Ŝajnas ke ĉi-foje la Milananoj intencis agi serioze. Sufiĉe; morgaŭ, se ne pli frue, oni ekscios ion».

«Mi pentas, ke mi ne iris ĉi-matene al Milano», diris alia.

«Se vi iros morgaŭ, do venos ankaŭ mi», diris tria, kaj alia, kaj alia.

«Jenon mi volus ekscii», reparolis la unua», ĉu tiuj Milanaj moŝtoj pensos ankaŭ pri l' malriĉaj kamparanoj, aŭ ĉu ili havigos leĝon taŭgan nur por si mem. Vi ja scias kiaj ili estas, ĉu? Fiereregaj urbanoj, kiuj volas ĉion por si mem; kaj

koncerne aliulojn: kvazaŭ ili ne ekzistus!». «La buŝon havas ankaŭ ni mem, ĉu por manĝi, ĉu por esprimi nian starpunkton», diris alia, kun voĉ-tono des pli modesta, ju pli aŭdacis lia propono: «kaj kiam la afero ekiris...», sed li preferis ne fini la frazon.

«Da kaŝita tritiko kuŝas ne nur en Milano», ekparolis alia, kun morna kaj malica mieno; kiam oni ekaŭdas ĉevalon proksimiĝi. Ĉiuj alkuras al la pordo; kaj, rekoninte la alvenanton, ili eliras al li renkonte. Temis pri Milana komercisto, kiu, veturante plurfoje ĉiujare al Bergamo por siaj komercoj, kutimis tranokti en tiu gastejo; kaj ĉar tie li preskaŭ ĉiam trovis la saman kunularon, li konis ilin ĉiujn. Ili amasiĝas ĉirkaŭ lin; unu kaptas la bridon⁶, alia la piedingon. «Bonvenon, bonvenon!». «Estu bone trovitaj!».

«Ĉu vi faris bonan vojaĝon?». «Bonege; kaj koncerne vin, kiel vi fartas?».

«Bone, bone. Kiajn novaĵojn vi alportas pri Milano?».

«Ha! jen la serĉantoj de novaĵoj», diris la komercisto, desuprante, kaj lasante la ĉevalon al servo-knabo. «Kaj krome, kaj krome», li daŭrigis, enirante kune kun la societo, «ĉi-hore la novaĵojn verŝajne vi konas eĉ pli bone ol mi».

«Tute nenion ni scias, vere», diris pluraj, metante la manon sur sian bruston.

«Ĉu eblas?» diris la komercisto. «Vi do aŭdos belajn... aŭ malbelajn aferojn. He, gastejestro, ĉu mia kutima lito estas libera? Bone: unu vinglason, kaj mian kutiman buŝplenon, tuj; ĉar mi volas enlitiĝi frue, por ekveturi frumatene, kaj atingi Bergamon por la horo de tagmanĝo. Kaj vi mem», li daŭrigis, sidigante sin ĉe l' ekstremo opozicia al tiu, kie sidis Renzo,

⁶ *bridon*: rimenon ligitan ĉirkaŭ la kapo de ĉevalo.

silenta kaj atenta, «Ĉu vi nenion scias pri ĉiuj diablaĵoj de hieraŭ?». «Pri hieraŭ, jes».

«Vidu do, ke vi ja konas la novaĵojn. Mi ja diris, ke vi, tie ĉi sidante ĉiam gvate, por traesplori la pasantojn...».

«Sed hodiaŭ, kio okazis hodiaŭ?».

«Ha, hodiaŭ. Ĉu nenion vi scias pri hodiaŭ?». «Tute ne: neniu pasis».

«Vi do permesu, ke mi malsekigu miajn lipojn; kaj poste mi al vi diros la aferojn de hodiaŭ. Vi aŭdos». Li plenigis la glason, li prenis ĝin per unu mano, per la unuaj du fingroj de la alia li levis la lipharojn, poste li glatigis al si la barbon, li trinkis, kaj li plu parolis: «hodiaŭ, karaj amikoj, riskis fariĝi tago kruda kiel hieraŭ, aŭ eĉ pli aĉa. Kaj al mi ŝajnas preskaŭ malvere, ke mi sidas ĉi tie, babilante kun vi; ĉar mi preskaŭ forigis la intencon pri vojaĝo, por resti garde al mia povra butikoj».

«Kia diablo ĉeestis?» diris unu el la aŭskultantoj.

«Ĝuste la diablo: vi aŭdos». Kaj li daŭrigis sian rakonton, distranĉante la manĝaĵon al li surtabligitan, kaj poste ĝin manĝante. La kunuloj, staraj ambaŭflanke de la tablo, aŭskultis lin gape; Renzo, sia-loke, ŝajnigante sin indiferenta, atentis eble pli ol ĉiuj, maĉante tute malrapide siajn lastajn buŝplenojn.

«Ĉi-matene do, tiuj kanajloj, kiuj faris hieraŭ tian hororan frakason, rendezuis je l' interkonsentitaj lokoj (jam estis akordo: tute preparitaj aferoj); tien ili kunvenis, kaj rekomencis tiun belan konduton, vagadi de strato al strato, kriante por altiri aliajn. Vi ja scias, ke okazas kiel se balai domon, mi diru kun respekto; ju pli oni balaas, des pli kreskas malpuraĵo. Kiam ili sin taksis sufiĉe multaj, ili ekmarŝis

direkte al la domo de sinjoro proviantestro; kvazaŭ ne sufiĉus la tiranaĵoj al li faritaj hieraŭ: al tia senjoro! ho kiaj friponoj! kaj kiajn fiaĵojn ili diris kontraŭ li! Nur inventaĵoj: bonmora, akurata senjoro: kaj tion rajtas diri mi, kiu estas intima al lia domo, kaj provizas al li ŝtofon por la servistaraj livreoj. Oni do ekmarŝis direkte al tiu domo: ja endus vidi kiajn kanajlojn, kiajn mienojn: imagu ke ili pasis antaŭ mia butikoj: mienoj kiaj... La Judoj de l' Kalvaria vojo⁷ tute ne estas tiaj. Kaj kiaj fiaĵoj eliris de tiuj buŝoj! tiaj ke oni ŝtopu al si la orelojn, se ne estus riskoplene montri sin tiele. Ili do iradis kun tuta intenco fari prirabon; sed...», kaj ĉe tio, li levis kaj streĉis la maldekstran manon, metante la pinton de la dikfingro ĉe la pinto de sia nazo.

«Sed kio?» demandis laŭte ĉiuj aŭskultantoj.

«Sed», daŭrigis la komercisto, «ili trovis la straton barita per traboj kaj ĉaroj, kaj, malantaŭ la barikado, belan vicon da hispanaj soldatoj, kun celumitaj arkebuzoj⁸, por ilin akcepti laŭmerite. Kiam ili ekvidis tian belan aranĝaĵon... Kion vi mem farus?».

«Ni retroirus».

«Certe; kaj tion ili faris. Sed vidu do, ĉu ne la diablo mem ilin kondukis. Ili estas tie, ĉe Cordusio, kaj ekvidas tiun bakejon, kiun ek de hieraŭ ili intencis prirabi; kaj kion oni faradis en tiu butikoj? Oni disdonis panon al la aĉetantoj; kaj ĉeestis kavaliroj, eminentaj kavaliroj, kiuj kontrolis, ke ĉio iru glate; sed tiuj (ili enhavis diablon, mi certigas vin, kaj krome

⁷ *Judoj...*: la krucumintoj de Jesuo, kiuj, laŭ popolaj tradicio kaj ikonografio, estis tre kruelaj.

⁸ *arkebuza*: tiama pafilo.

ĉeestis instigantoj), invadas kiel malesperuloj; vi rabu, mi rabu: en palpebruma daŭro, kavaliroj, bakistoj, aĉetantoj, panoj, vendotablo, benkoj, farunujoj, kestoj, sakoj, kribriloj, brano, faruno, pasto, ĉio estas renversita».

«Kaj kion la hispanaj soldatoj?». «La hispanaj soldatoj havis la domon de l' proviantestro por gardi: ne eblas samtempe kaj ĉanti kaj porti krucon⁹. Ĉio okazis dum palpebrumo, mi ripetas: rabu, rabu; ĉio ajne utila estis forportita. Kaj krome ripetiĝas tiu bela elpenaĵo kiel hieraŭ: la reston alporti en la placon kaj flamigi. Kaj la kanajloj jam komencis eligi materialon; kiam unu pli kanajla ol ceteraj, vi divenu kian belan proponon li elmetis?». «Kion?». «Amasigi ĉion en la butikon mem, kaj ekbruligi kaj la amasaĵon kaj la domon. Tuj dirite, tuj farite...». «Ĉu oni ekbruligis?». «Atendu. Najbara honestulo ekhavis ĉielan inspiron. Li rapidis en la suprajn ĉambrojn, serĉis krucifikson¹⁰, trovis ĝin, pendigis ĝin ĉe fenestra arkaĵo, li kaptis ĉe litkapo du benitajn kandelojn, ekbruligis ilin, kaj metis ilin sur la fenestro-breto, dekstre kaj maldekstre de la krucifikso. La homoj suprenrigardas. En Milano, oni devas diri, ankoraŭ estas da Dio-timo; ĉiuj prudentiĝis. Mi volas diri: plejgranda parto; ĉeestis verdire da diabloj tiaj, kiuj, por rabi, ekbruligus eĉ la paradizon; sed rimarkinte ke la popolo ne konsentas kun ili, ili devis ĉesi, kaj kvietiĝi. Vi nun divenu, kiu do alvenis subite. Ĉiuj katedralaj monsinjoroj procesie, kun levita kruco, en ĥorejaj ornatotoj; kaj monsinjoro Mazenta, ĉefpastro, komencis prediki unuflanke, kaj monsinjoro Settala, konfes-prenisto,

⁹ *ĉanti kaj porti krucon*: du diversaj religiaj ritoj ne fareblaj de unu nura persono samtempe.

¹⁰ *krucifikson*: bildon de Jesuo krucumita.

aliflanke, kaj same ankaŭ la aliaj: nu, honestuloj! kion do vi intencas fari? Ĉu ĉi tian ekzemplon vi donas al viaj filetoj? Ek, revenu hejmen; ĉu vi ne scias, ke la pano estas malpli kosta ol antaŭe? Ekiru vidi, ke estas afiŝite ĉe la stratanguloj».

«Ĉu estis vere?».

«Diable! Ĉu vi taksas, ke la katedralaj monsinjoroj venis en solena mantelo, por eldiri malveraĵojn?».

«Kaj kion do faris la popolo?».

«Iom post iom ili foriris; ili rapidis al la stratanguloj; kaj la kapablaj legi vidis ke estas fiksita lim-prezo. Divenu do: ok uncoj¹¹ da pano kontraŭ unu groŝo!».

«Kia feliĉaĵo!».

«Ja bela konvenaĵo; kondiĉe ke ĝi daŭru. Ĉu vi scias kiom da faruno oni fuŝis inter hieraŭ kaj hodiaŭ matene? Sufiĉe por vivteni la tutan duklandon dum du monatoj».

«Kaj por la loĝantaj ekster Milano, ĉu oni faris nenian bonan leĝon?».

«Tio, kio estas farita por Milano, estas tute je kosto de la urbo mem. Mi ne scias kion al vi diri: por vi tio, kion volos Dio. Ĉiuokaze, la tumultoj finiĝis. Sed mi ne ĉion al vi diris; jen nun venas la afero plej bela».

«Kio do estas ankoraŭ?».

«Estas, ke hieraŭ vespere, aŭ eble ĉi-matene, oni kaptis multajn; kaj baldaŭ disfamiĝis, ke la ĉefoj estas pendumotaj. Apenaŭ la onidiro disvastiĝis, ĉiu ekiris hejmen plej kurt-voje, por ne riski kalkuliĝi inter tiaj. Milano, kiam mi foriris, aspektis kiel monakejo».

«Ĉu oni vere pendumos ilin?».

«Tute jes! kaj tre baldaŭ», respondis la komercisto.

¹¹ uncoj: pezunuo (= ĉ. 30 gramoj)

«Kaj kion faros la popolamaso?» plu demandis la demandinto.

«Kion la popolo? Ĝi iros por spekti», diris la komercisto. «Tiom multe ili deziris vidi kristanon morti sub-ĉiele, ke ili volus, kanajloj! murdaĉi sinjoron proviantestron. Anstataŭ li, ili havos kvar fiulojn, servitajn kun ĉiuj formalajoj, akompanatajn de l' kapucenoj kaj de l' frataranoj¹² de l' pia morto; homojn meritintajn tion. Estis providence, vidu; tio nepris. Oni jam komencis la fi-kutimon eniri butikojn kaj aĉeti, ne tuŝante sian monujon; se ilin toleri, post pano oni iros al vino, kaj tiel plu... Imagu, ĉu ili volus ĉesigi propra-iniciate tiel komfortan kutimon. Kaj mi povas certigi vin ke, por honestulo, kiu havas malfermitan butikon, tio estis penso tute ne gaja.

«Estas vere», diris unu el la aŭskultantoj. «Estas vere», ripetis unu-voĉe la ceteraj.

«Kaj», daŭrigis la komercisto, al si viŝante la barbon per la buŝ-tuko, «la afero estis jam delonge organizita; subestis kliko¹³, ĉu vi scias?

«Ĉu subestis kliko?

«Jes, kliko. Ĉiuj kabalaĵoj teksitaj de l' Navaranoj, de tiu kardinalo¹⁴ tie en Francujo, vi scias kiun mi aludas, kiu havas tian duon-turkan nomon, kaj kiu ĉiutage elpensas ion, por iel spiti al la Hispana reĝ-krono. Sed super ĉio, li celas iel

¹² *kapucenoj... frataranoj...*: religiaj homoj, akompanantaj kondamnitajn, por ke ili mortu kiel piaj kristanoj.

¹³ *kliko*: kaŝa, malica, konspira partieto.

¹⁴ *Navaranoj... kardinalo*: aludo al la Francoj, malamikoj de Hispanujo (sub kies regado kuŝis Milano). Oni nomis ilin Navaranoj el ilia reĝo Henriko la 4-a de Navaro. Franca ĉefministro estis kardinalo Richelieu, kies nomo (elp. pli-malpli Riŝlje') sonas tre strange (duon-turke) por Italoj.

manovri kontraŭ Milanon; ĉar tia ruzulo ja scias, ke tie ĉi staras la ĉefforto de la reĝo.

«Kompreneble».

«Ĉu vi volas pri tio pruvon? La plej grandan bruon faris fremduloj; vagis en la urbo vizaĝoj neniam viditaj en Milano. Mi preskaŭ eĉ forgesis al vi rakonti pri afero al mi raportita kiel certa. La justico estis kaptinta ulon en gastejo ...». Renzo, kiu eĉ ne unu silabon perdis el tiu parolo, ĉe l' tuŝo de tiu ĉi klavo, eksentis malvarmon kaj skuiĝis, antaŭ ol li pensus pri memrego. Neniu tamen tion ekvidis; kaj la diranto, tute ne interrompante la rakonton, daŭrigis: «...Ulon, pri kiu oni ankoraŭ ne tute scias, de kie li venis, nek kiu lin sendis, nek kia homo entute li estas; sed certe li estis unu el la ĉefoj. Jam hieraŭ, kiam plej fortis la frakaso, li diablis; kaj poste, ne kontenta pri tio, li komencis prediki, kaj proponi kvazaŭ galantaĵon, ke oni mortigu ĉiujn senjorojn. Kanajlo! Kiu vivtenus malriĉulojn, se ĉiuj riĉuloj estus murditaj?¹⁵ La justico embuskis kaj kaptegis lin; oni forprenis de li amason da leteroj; kaj oni ekkondukis lin al kaĝo; sed kio? Liaj kompanoj, kiuj patrolis ĉirkaŭ la gastejo, alvenis amase, kaj tian friponon liberigis».

«Kaj kio pri li okazis?»

«Oni ne scias; supozeble li forkuris, aŭ li sin kaŝas en Milano: temas pri homoj, kiuj havas nek lokon nek hejmon, kaj ĉiuloke trovas por ekloĝi kaj sin kaŝi: sed tio, nur dum la diablo povas kaj volas ilin helpi: kaj poste, tute neatendite, jen malfeliĉo; ĉar falas piro matura laŭ leĝo natura. Dume oni certe scias, ke liaj leteroj restis en la manoj de la justico, kaj ke en ili estas skribita la tuta kabalaĵo; kaj onidire multe da

¹⁵ *Kiu vivtenus...?*: unu el la ironiaĵoj kutimaj ĉe Manzoni.

homoj estas implikotaj. Des pli aĉe por ili, kiuj duon-renversis Milanon, kaj intencis fari eĉ pli aĉe. Onidire la bakistoj estas kanajloj. Mi ja konsentas; sed oni devas ilin pendumi per la justico. Da tritiko estas kaŝita. Kiu do ne scias tion? Sed estas tasko de l' regantoj teni lertajn spionojn, kaj iri ĝin elfosi, kaj sendi ankaŭ l' akaparistojn bati piedojn en aero, kune kun la bakistoj. Kaj se l' regantoj nenion faras, tiam apartenas al la civitanaro apelacii; kaj se unuafoje oni ne elaŭdas, apelacii denove; ĉar per plia kaj plia apelacio oni fine sukcesas; kaj ne starigi tian kriman kutimon, eniri butikojn kaj magazenojn, kaj rabi varojn senpune».

Al Renzo la nemulta manĝo tute fariĝis kvazaŭ veneno. Al li ŝajnis mil jarojn malfrue por eliri kaj foriri de tiuj gastejo kaj lando; kaj jam pli ol dek fojojn li diris al si mem: mi iru, mi iru. Sed la timo, ke per tio li suspektigos, gigantiĝis senmezure kaj tiranis super liaj pensoj, kaj tio plu tenis lin senmova sur la benko. En tia hezitado, li pensis ke la klaĉemulo iam ajn ĉesos paroli pri li; kaj li konkludis en si mem, ke li ekiros, tuj kiam li aŭdos lin tuŝi alian temon.

«Ĝuste pro tio mi», diris unu el la societo, «mi, kiu ja scias, kiel evoluas ĉi tiaj aferoj, kaj ke ne konvenas al honestuloj ĉeesti en tumultoj, mi ne cedis al scivolo, kaj mi restis hejme».

«Kaj kio pri mi? Ĉu mi ekiris?» diris alia.

«Kio pri mi?» aldonis tria: «Se mi hazarde troviĝus tiam en Milano, mi lasus ĉian aferon nefinita, kaj tuj revenus hejmen. Mi havas edzinon kaj filetojn; kaj krome, mi diras la veron: mi ne ŝatas bruaĉojn».

Ĉe tio la gastejestro, kiu kune aŭskultadis, iris al la alia ekstremo de l' tablo, por vidi, kion do faras tiu fremdulo.

Renzo elprofitis la oportunon, vokis la gastejstron per gesto, petis la konton, ĝin pagis senmarĉande, malgraŭ la tute magra situacio; kaj sen pluaj paroloj, li iris rekte al la pordo, transiris la sojlon, kaj, laŭ-providence¹⁶, li ekiris en direkton malan ol tiu de kie li estis alveninta.

¹⁶ *laŭ-providence*: kiel volas Dio, t.e. laŭhazarde.

XVII

Ofte sufiĉas unu pasio, por perturbi homon; vi do imagu du samtempajn, reciproke batalantajn interne de unu sama koro. La povra Renzo, kiel vi scias, jam de multaj horoj havis en si du tiajn pasiegojn: unuflanke la deziron kuri, aliflanke la vivan senton, ke li tute bezonas resti kaŝita: kaj la teruraj vortoj de la komercisto ambaŭ pasiojn subite plifortikigis supermezure. Lia aventuro kaŭzis do bruon; oni do rezolutis lin kapti ĉiel ajn; ne scieblis kiom da ĝendarmoj vagas, por lin ĉasi! Kiajn ordonojn oni dissendis, por esplori en la vilaĝoj, en la gastejoj, tra la stratoj! Verdire li pripensis, ke la ĝendarmoj lin konantaj estas nur du, kaj ke li ne havas la nomon skribita surfrunte; sed li ekmemoris rakontojn pri fuĝantoj surprizitaj kaj malkovritaj pro strangaj hazardoj, agnoskitaj per la paŝo-maniĝo, la suspektinda mieno, kaj aliaj ne imagitaj indicoj: ĉio suspektigis lin. Malgraŭ tio, ke ĉe lia eliro de Gorgonzola, en la horloĝ-turo batis la dudekkvara horo¹, kaj la proksimiĝanta mallumo pli kaj pli forigos tiujn danĝerojn, malvolonte li trafis la ĉef-vojon, kaj li intencis eniri la unuan vojeton, kiu al li ŝajnos konduki laŭ la direkto de li sopirata. Komence li renkontis kelke da vojaĝantoj; sed ĉar lia fantazio plenis je tiaj timaĉoj, neniun li kuraĝis alparoli, por informiĝi pri la ĝusta vojo. – Tiu homo diris: ses mejloj – li pensis –: se, irante misvoje, ili fariĝus eĉ ok aŭ dek, la kruroj, kiuj trairis la aliajn, trairis ankaŭ la ceterajn. Ale al Milano certe mi ne marŝas; mi do iras direkte al Adda. Plu marŝante, mi frue-malfrue ĝin atingos. Adda havas laŭtan voĉon; kaj kiam mi al ĝi proksimos, mi ne plu bezonos voj-montranton. Se troviĝos

¹ *la dudekkvara horo*: t.e. la lasta taghoro ĉar, laŭ la tiama hor-sistemo, la tago finiĝis ĉe l' sun-subiro.

boato, por transveturi, mi tuj transpasos; se ne, mi atendos ĝismatene en kampo, sur arbo kiel paseroj: preferinde sur arbo ol en malliberejo. –

Baldaŭ li vidis vojeton maldekstren; kaj li eniris ĝin. Tiuhore, se li trafus homon, li sen-ceremonie petus lin indiki al li la vojon; sed nenian vivan animon li aŭdis. Li do iris kien la vojo lin kondukis; kaj dumtempe li pensis:

– Ĉu mi diabli! Ĉu mi murdi ĉiujn senjorojn! Ĉu mi, amason da leteroj! Ĉu miaj kompanoj gardostaris por mi! Mi pagus iom da mono, por troviĝi kun tiu komercisto vizaĝ-al-vizaĝe trans Adda (ha, kiam do mi transiros tiun benatan riveron!), kaj haltigi lin, kaj trankvile demandi lin, kie do li ĉerpis tiajn belajn sciigojn. Nun vi sciu, mia kara sinjoro, ke la afero iris ĉi tiel kaj tiel, kaj ke la diablaĵo, kiun mi faris, estis nur, ke mi helpis al Ferrer, kvazaŭ al frato; vi sciu, ke tiuj friponoj, kiuj, laŭ vi, estis miaj amikoj, intencis fari al mi aĉan ŝercon, pro tio ke iumomente mi diris al ili kristanan parolon; vi sciu, ke dum vi staris garde al via butikoj, mi frakasigis miajn ripojn, por savi vian sinjoron proviantestron, kiun mi neniam vidis nek konis. Vane do atendu, ke estontece mi ĝenu min duafoje, por helpi senjorojn... Verdire oni devus ĉiuokaze tion fari, por savi sian animon: ankaŭ ili mem estas nia proksimulo². Kaj tiu granda amaso da leteroj, kiuj priskribas la tutan kabalon, kaj nun kuŝas enmane de la justico, kiel vi certe scias; ni vetu, ke mi aperigas ilin ĉi tie sen helpo de diablo? Ĉu vi scivolas vidi tiun amason? Jen ĉi tie... Ĉu nur unu letero? Jes, sinjoro, nur unu letero; kaj tiun ĉi leteron, se tion vi deziras ekscii, skribis kapuceno, kiu povus al vi instrui la

² *proksimulo*: laŭ la Evangelio, ĉia homo estas proksimulo, kaj do kristanoj devus helpi ĉiujn, eĉ malamikojn.

kristanan doktrinon kiam ajn; kapuceno... kies unu barbero, senofende, valoras pli multe ol via tuta barbo; kaj ĉi-letero – kiel vi vidas – estas skribita al alia monako, li ankaŭ homo tia... Vi do vidas, kiu-specaj estas miaj kanajlaj amikoj. Kaj alifoje vi lernu kiel paroli; ĉefe koncerne proksimulon. –

Sed post iom da tempo, ĉi tiuj kaj similaj pensoj tute ĉesis: la aktualaj cirkonstancoj okupis ĉiujn fakultojn de la povra migranto. La timo pri persekutiĝo aŭ malkovriĝo, kiu dum hela tago tiom amarigis lian vojaĝon, nun ne plu ĝenis lin; sed kiom da aliaj aferoj igis ĝin pli malagraba! Mallumo, soleco, laceco pliiĝinta kaj nun eĉ dolora; blovis obtuza, monotona, subtila venteto, kiu kompreneble ne tre helpis al li, kiu surhavis ankoraŭ la vestaĵojn surmetitajn por rapidi al geedziĝo, kaj triumfe reveni hejmen; kaj, afero kiu ĉion pliaĉigis, tiu irado hazarda, kaj, se tiel diri, palpserĉa al loko ripoza kaj sekura.

Kiam eventuale li trafis en vilaĝon, li tra ĝi marŝis tute malrapide, esplorante, ĉu ankoraŭ estas malfermita pordo; sed li vidis nenian signon de maldormanta homo, krom kelke da lumetoj videblaj tra fenestraj ŝirmiloj. Survoje ekster vilaĝoj, li haltetis de temp' al tempo; li streĉis l' orelojn, ĉu aŭdeblas tiu benata voĉo de Adda-rivero; sed vane. Aliajn voĉojn li ne aŭdis, krom hundajn jelpojn el izolaj farmejoj, vagajn tra l' aero, plendajn kaj samtempe minacajn. Ĉe lia proksimiĝo al tiaj farmejoj, la jelpado ŝanĝiĝis al rapida kaj rabia bojado: pasante antaŭ la dom-pordo, li aŭdis, kaj preskaŭ vidis la bestaĉon, kun la muzelo ĉe l' fendeto, duoblige la hurlojn: kaj tio tute forigis la tenton pordo-frapi, kaj peti gastigon. Kaj eble eĉ sen hundoj li ne decidus fari tion. – Kiu estas tie? – li imagis: – kion vi volas ĉi-hore? Kiel vi alvenis ĉi tien?

Konatigu vin. Ĉu ne estas gastejoj por tranokti? Jen, kion plej bonŝance oni al mi diros, se mi pordo-frapos: almenaŭ se tie ne loĝas timemulo, kiu ekkrius: helpu! jen ŝtelisto! Oni devas tuj havi ion klaran por respondi: kaj kian respondon mi havas? Homo, kiu aŭdas noktan bruon, nenion imagas krom ŝtelistojn, krimulojn, embuskojn: neniam oni imagas ke honestulo povus dumnokte piediri survoje, se li ne estas kavaliro veturanta kaleŝe. – Li do rezervis tiun decidon al eventuala ekstrema neceso, kaj li plu marŝis, esperante almenaŭ malkovri, se ne transiri, la riveron dum tiu sama nokto, kaj ne devi esplor-serĉi ĝin dum hela tago.

Marŝante kaj marŝante, li alvenis tien, kie la kulturata kamparo finiĝis je senkultivejo kun sporadaj filikoj kaj skopariaj erikoj. Tio al li ŝajnis, se ne indico, almenaŭ ajna argumento, ke la rivero estas proksima, kaj li pluiris en la senkultivejon, laŭ pado, kiu ĝin trais. Post kelke da paŝoj, li ekhaltis por aŭskulti; sed ankoraŭ vane. La tedon de l' marŝado pliiĝis la sovaĝeco de la loko, ĉar ne plu videblis nek morusujo nek vinber-arbo, nek aliaj signoj de homa kultivado, kiuj antaŭe ŝajnis konsistigi preskaŭ lian kompanion. Malgraŭ tio li plu iris; kaj ĉar en lia menso ekestis iaj bildoj, iaj aperoj, restintaj en lia memoro el rakontaĵoj aŭskultitaj dum infanaĝo, tial, por ilin forpeli aŭ kvietigi, li recitis dummarŝe preĝojn por la mortintoj.

Iom post iom li troviĝis inter pli altaj veproj el pruneloj, el kverketoj, el kratagoj. Plu-irante, kaj akcelante la paŝadon, pli malpacience ol volonte, li komencis vidi inter la veproj sporadajn arbojn; kaj plu marŝante laŭ la sama pado, li ekvidis, ke li eniras arbaron. Penetrante en ĝin, li sentis ian abomeneton; li superis ĝin, kaj kontraŭvole li plu iris; sed ju

pli li marŝis, des pli kreskis abomeno, des pli ĉia objekto kaŭzis al li ĝenon. La arboj de fore al li ŝajnis figuroj strangaj, deformaj, monstraj; lin ĝenis l' ombro de la arbo-pintoj apenaŭ svingataj, kiu tremetis sur la pado, kiun la luno lumigis ĉi tie kaj tie; eĉ la krakado de l' sekaj folioj, kiujn li surtretis aŭ movis marŝante, havis por lia orelo mi ne scias kion repuŝan. Liaj kruroj sentis kvazaŭ manion aŭ impulson ekkuri, kaj samtempe ŝajnis, ke ili penas subteni lin. Li sentis la noktan venteton bati pli frida kaj kruda sur la frunton kaj la vangojn; li sentis ĝin trablovi inter la vestaĵoj kaj la haŭto, kaj krispigi ĉi-lastan, kaj penetri pli akra en la ostojn draŝitajn pro laceco, kaj estingi ties lastan restaĵon de energio. Iumomente al li ŝajnis, ke lin tute supervenkas tiu abomeno, tiu nedifinita hororo, kontraŭ kiun lia animo jam longete bataladis. Li estis tute svenonta; sed, terurite, pli ol cetere, de sia teruro, li revokis al la koro siajn praajn spiritojn, kaj ordonis ke ĝi rezistu. Tiele momente firmiĝinte, li ekhaltis, por pripensi kion fari; li decidis tuj reveni, tra la irita vojo, senpere al la laste trapasita vilaĝo, inter la homojn, kaj serĉi tranoktejon, eĉ en gastejo. Kaj restante tiel senmova, interrompinte la susuron de l' piedoj en la foliaro, dum ĉio ĉirkaŭ li silentis, li komencis aŭdi bruon, murmuron, murmuron de fluanta akvo. Li streĉas la orelojn; li certas; li elkrias: «estas Adda!». Ĝi estis retrovo de amiko, de frato, de savanto. La laceco preskaŭ malaperis, revenis lia pulso, li sentis la sangon flui libera kaj varmeta tra ĉiuj vejnoj, li sentis kreski fidemajn pensojn, kaj grandparte sveni tiun malcertecon kaj pezecon de ĉiuj aferoj; kaj li ne hezitis penetri pli kaj pli multe en la arbaron, direkte al la amikeca bruo.

Post kelke da momentoj li atingis la ekstremon de la

ebenaĵo, rande de profunda bordo; kaj rigardante malsupren inter la veproj, kiuj kovris la bordon, li vidis la akvon ekbrili kaj flui. Poste, levante la rigardon, li vidis la vastan transriveran ebenaĵon, kun sporadaj vilaĝoj, kaj transe la montetojn, kaj sur unu el ili grandan blankeskan makulon, kiu al li ŝajnis urbo: Bergamo sendube. Li desupris iomete laŭdeklive, kaj per manoj kaj brakoj disigante kaj disbranĉigante la vepraron, li rigardis malsupren, por vidi, ĉu boateto moviĝas en la rivero; li aŭskultis, ĉu li aŭdas remil-plaŭdon; sed li nenion vidis nek aŭdis. Se temus pri io malpli granda ol Adda, Renzo tuj desuprus, por provi ties vadon; sed li tute konsciis, ke Adda ne estas rivero por trakti konfidence.

Tial li komencis tute frid-sange sin demandi, kion decidi. Arbon surgrimpi, kaj tie sidi atendente la aŭroron, dum la eble ses horoj ankoraŭ restantaj, kun tia venteto, kun tia prujno³, tiel vestite: estis pli ol sufiĉe por vere frostiĝi. Promeni ire-reire dum tiu tuta tempo: krom tio, ke ĝi ne konsistigus efikan helpon kontraŭ la pika malvarmo de tiu serena nokto, ĝi signifus postuli tro multe de liaj povraj kruroj, jam penintaj pli ol laŭdeve. Li ekmemoris, ke, en unu el la kampoj plej proksimaj al la senkultivejo, li vidis unu el la pajlo-kovritaj kabanoj, konstruitaj el trunkoj kaj branĉoj, kaj stukitaj per koto, kie la Milaniaj kampuloj kutimas, somere, demeti la rikoltaĵon, kaj tie rifuĝi dumnokte por ĝin gardi: en la ceteraj sezonoj ili restas forlasitaj. Li tuj destinis ĝin sia tranoktejo; li reiris la padon, repasis tra l' arbaro, la makiso⁴, la senkultivejo; kaj li iris al la kabano. Vermo-borita kaj fendita pordaĉo estis fermetita sen ŝlosilo nek riglilo; Renzo ĝin

³ *prujno*: subtila tavolo el glacieroj.

⁴ *makiso*: sovaĝa spaco kovrita de veproj kaj arbedoj.

malfermis, eniris; li vidis ligno-kradon pendigitan kaj subtenatan per torditaj branĉetoj, kvazaŭ hamakon;⁵ sed li ne zorgis alsupri al ĝi. Li vidis sur-grunde iom da pajlo; kaj li pensis, ke dormeto estos plenĝua eĉ tie.

Sed antaŭ ol kuŝiĝi sur tiu lito, kiun la Dia Providenco al li disponigis, li genuiĝis, por danki pro tiu donaco, kaj pro la tuta helpo ricevita dum tiu terura tago. Poste li recitis siajn kutimajn preĝojn; kaj aldone, li pardonpetis la Di-Sinjoron pro tio, ke li ne recitis ilin hieraŭ vespere; pli ĝuste, por raporti liajn vortojn: pro tio ke li enlitiĝis kiel hundo, kaj eĉ pli aĉe. – Kaj pro tio, – li aldonis en si mem; apogante la manojn sur la pajlon, kaj de surgenue sin kuŝigante: – pro tio ĉi matene min trafis tia bela vekiĝo. – Poste li kolektis la tutan pajlon, kiu restis ĉirkaŭe, kaj li akomodis ĝin sur sin, laŭpove igante ĝin speco de lit-kovrilo, por mildigi la malvarmon, kiu ankaŭ tie estis tre sentebla; kaj sub ĝi li buligis sin, kun la intenco tradormi belan dormon, ĉar al li ŝajnis, ke li aĉetis ĝin eĉ pli kare ol laŭdeve.

Sed tuj kiam li fermis la okulojn, komenciĝis en lia memoro, aŭ en lia fantazio (la precizan lokon mi ne scipovas al vi diri), komenciĝis, mi diras, svarmado tiel hom-plena, tiel insista, ke... adiaŭ dormo! La komercisto, la notario, la sbiroj, la glavo-faristo, la gastejestro, Ferrer, la proviantestro, la kompanio en la drinkejo, tiu tuta homamaso tra la stratoj, kaj krome Don Abbondio, kaj krome Don Rodrigo: ĉiuj homoj, kun kiuj Renzo havis koncernojn.

Nur tri bildoj al li sin prezentis sen akompano de malagraba memoro, tute ne suspektindaj, tute amindaj, kaj precipe du el ili, tre diferencaj verdire, sed strikte kunligitaj en

⁵ *hamakon*: speco de lito horizontale pendigita.

la koro de la junulo: nigra har-plektaĵo kaj blanka barbo. Sed eĉ la konsolo, kiun li sentis ĉe ilia penso, estis nek simpla nek trankvila. Pensante pri l' bona frato, li pli vive sentis honton pro siaj misfaroj, pro la fia malsobereco, pro sia malkonsidero pri liaj patrecaj konsiloj; kaj kontemplanter la bildon de Lucia! ni ne provos diri liajn sentojn: la leganto konas la cirkonstancojn; li imagu ilin. Kaj kiel li povus forgesi tiun povran Agnese-n? Ŝi jam elektis kaj rigardis lin unueca kun sia ununura filino kaj, eĉ antaŭ ol ricevi de li la titolon de patrino, ŝi alprenis patrinajn lingvaĵojn kaj koron, kaj montris per faroj patrinecan zorgon. Sed pluan ĉagrenon, kaj ne malpli akran, kaŭzis la penso ke la kompatinda virino, ĝuste pro tiaj am-sentoj, pro sia granda amo al li, nun estas eldomigita, preskaŭ vagabonda, malcerta pri estonteco, kaj rikoltas malfeliĉojn kaj penojn ĝuste tie, kie ŝi esperis trankvilon kaj ĝojon en siaj lastaj vivo-jaroj. Kia nokto, povra Renzo! Ĝi devus esti la kvina post lia edziĝo! Kia ĉambro! Kia geedza lito! Kaj post kia tago! Kaj por atingi kian morgaŭon, kian serion da tagoj! – Tio kion volas Dio, – li respondis al la pensoj, kiuj plej multe lin ĝenis: – tio, kion volas Dio. Li ja scias, kion Li faras: Li ekzistas ankaŭ por ni. Ĉio estu punpage por miaj pekoj. Lucia estas tiel bonvirta! Li ne volos suferigi ŝin longe, longe, longe! –

Inter ĉi tiaj pensoj, ne plu esperante ekdormon, kaj pli kaj pli turmentate de l' malvarmo, tiom ke de temp' al tempo li senvole ektemis, kaj klakigis la dentojn, li sopiris la tagiĝon, kaj malpacience kalkulis la malrapidan fluon de l' horoj. Mi diras kalkulis, ĉar ĉiun duonhoron li aŭdis, en tiu vasta silento, sonori la batojn de tur-horloĝo: tre supozeble temis pri tiu de Trezzo. Kaj kiam unuafoje trafis liajn orelojn tiu bato, tiel

neatendita, sen ke li povus imagi la lokon, de kie ĝi devenas, ĝi faris al li misteran kaj solenan impreson, kvazaŭ averto flanke de ne-vidata persono, kun nekonata voĉo.

Kiam finfine la sonoril-martelo frapis dek unu batojn⁶, kio estis la horo planita de Renzo por sin levi, li leviĝis fakte, duone frost-rigida, li surgenuiĝis kaj eldiris, pli fervore ol kutime, la matenajn preĝojn, li stariĝis, li sin streĉis ĉiudirekten, li skuis la trunkon kaj la ŝultrojn, kvazaŭ por kunmeti ĉiujn membrojn, ĉar ŝajnis ke ĉiu staras aparte, li blovis en unu manon, poste en la alian, li interfrotis ilin, li malfermis la kabanon pardon; kaj li ekrigardis dekstren kaj malen, por vidi, ĉu neniu ĉeestas. Kaj neniun vidinte, li serĉis la hieraŭvesperan padon; li tuj rekonis ĝin, kaj tien li ekiris.

La ĉielo promesis belan tagon: ĉe unu flanko la luno, pala kaj sen-radia, distingiĝis en la senmezura griz-blua fono, kiu malsupre, oriente, apenaŭ nuanciĝis al roz-flava koloro. Pli sube, ĉe l' horizonto, kelke da nuboj, brun-lazuraj, etendiĝis laŭ longaj, malegalaj tavoloj, el kiuj la plej malsupraj estis sub-randitaj per kvazaŭ fajra strio, kiu fariĝis pli kaj pli viva kaj akra: sude, aliaj kunvolvitaĵoj, malpezaj kaj molaj, se tiel diri, pli kaj pli lumiĝis laŭ mil sen-nomaj koloroj: tiu ĉielo de Lombardujo, tiel bela, kiam ĝi belas, tiel brila, tiel paca. Se Renzo troviĝus tie por promeno, li certe supren-rigardus kaj admirus tiun tagiĝon tiel malsaman ol tiu, kiun li kutimis vidi sur siaj montoj; sed li priatentis nur sian vojon, kaj marŝis longapaŝe, por varmiĝi kaj por alveni frue. Li trairas la kampojn, trairas la senkultivejon, trairas la makison, transiras la arbaron, dis-rigardante, kaj ridante kaj samtempe hontante

⁶ *dek unu batojn*: laŭ la tiama hor-sistemo, unu horon antaŭ la tagiĝo.

pri la instinkta teruro, kiun li sentis antaŭ nemulte da horoj; li atingas la river-bordon, li rigardas malsupren; kaj tra la branĉoj li vidas fiŝistan boateton alvenantan malrapide kontraŭflue, preskaŭ tuŝe al la bordo. Li tuj desupras plej kurtvoje inter la veproj; jen li estas ĉe l' bordo; li tute mallaŭte vokas al la fiŝisto; kaj afektante ke li petas bagatelan servon, sed senkonscie preskaŭ preĝpetante, li gestas ke li albordiĝu. La fiŝisto turnas la rigardon laŭlonge de l' bordo, rigardas atente al la alfluanta akvo, retrorigardas al la forfluanta, kaj direktas la pruo⁷ al Renzo, kaj albordiĝas. Renzo, kiu staris rande de l' bordo, preskaŭ kun unu piedo en la akvo, kaptas la pinton de l' boato, ensaltas en ĝin, kaj diras: «Ĉu vi farus al mi kontraŭpage la servon transriverigi min?». La fiŝisto tion estis diveninta, kaj jam sin turnis tiudirekte. Renzo, vidante sur la boat-fundo alian remilon, sin klinas, kaj kaptas ĝin.

«Trankvile, trankvile», diris la mastro; sed vidante la lertecon kun kiu la junulo kaptis la ilon, kaj komencis regi ĝin, «ha, ha», li daŭrigis: «vi spertas pri la metio».

«Iomete», respondis Renzo, kaj li eklaboris kun energio kaj lerteco pli ol amatora. Kaj, neniam malakcelante, li de temp' al tempo turnis rigardon sombran al la bordo de kiu ili foriĝis, kaj poste alian malpaciencon al tiu, kien ili celis, kaj lin rongis tio, ke ne eblis alnavigi plej kurtvoje; ĉar la fluo estis tie tro rapida, se ĝin tranĉi transverse; kaj la boato, parte rompante, parte sekvante la akvo-fluon, devis navigi diagonale. Kiel okazas ĉe ĉiuj aferoj iom komplikaj, ke la malfaciloj unue aperas ĝenerale, kaj poste, ĉe l' efektivigo, ili montriĝas detale, nun kiam Adda jam estis preskaŭ transirita, lin ĝenis la ne-certeco, ĉu ĝi landlimas, aŭ ĉu, superinte tiun

⁷ *la pruo*: la antaŭan parton de la boato.

obstaklon, restos plua. Tial, vokinte la fiŝiston, kaj gestante per la kapo al la blankeska makulo, kiun li vidis pasint-nokte, kaj kiu tiam aperis ja pli distinge, li diris: «Ĉu estas Bergamo tiu loko?».

«Urbo Bergamo», respondis la fiŝisto.

«Kaj ĉu tiu bordo apartenas al Bergamo?».

«Lando de sankta Marko».

«Vivu sankta Marko!» elkriis Renzo. La fiŝisto nenion diris.

Fine ili tuŝas tiun bordon: Renzo tien sin ĵetas; li dankas Dion sekrete, kaj la boatiston parole; li enpoŝigas la manojn, eligas unu berlinga-moneron, kio estis ne eta fordono, konsidere la situacion, kaj li prezentas ĝin al la honestulo; kiu, turninte denove la rigardon al la Milania bordo, kaj al la rivero supren kaj suben, etendis la manon, prenis la trink-monon, enpoŝigis ĝin, poste li kun-premis la lipojn, kaj aldone li metis fingron⁸ kruce sur ilin, akompanante la geston per esprimo-plena okulumo; kaj poste li diris: «bonan vojaĝon», kaj boatis returnen.

Por ke la tuja kaj diskreta komplezo de tiu viro rilate nekonaton ne tro mirigu la leganton, ni devas lin sciigi, ke tiu homo, ofte petate de kontrabandistoj kaj ekzilitoj fari tian servon, kutimis plenumi ĝin; ne tiom por la malmulta kaj malmulta mon-profitado, kiun li povus gajni, kiom por ne malamikiĝi kun tiu-specaj homoj. Li ĝin plenumis, mi diras, ĉiufoje kiam li certis, ke ne vidas lin akcizistoj nek sbiroj nek spionoj. Tiel, ne amante la unujn pli ol la aliajn, li klopodis kontentigi ambaŭ, kun tia senpartio, kiu estas ordinara ĉe l' homo, kiu devas trakti kun unuj, kaj doni konton al aliaj.

⁸ *fingron*: silento-pete.

Renzo haltis iomete ĉe-borde, por kontempli la kontraŭan bordon: tiun landon, kiu antaŭ ne-multe ege brulis sub liaj piedoj. – Ha! vere mi estas for! – estis lia unua penso. – Tie restu, damnita lando, – estis la dua, kiel adiaŭo al la patrujo. Sed la tria penso rapidis al tiuj, kiujn li lasis en tiu lando. Tiam li krucigis la brakojn surbruste, eligis suspiron, mallevis la okulojn al la akvo, kiu fluis ĉe l’ piedoj, kaj pensis: – Ĝi pasis sub la ponto! – Tiele, laŭ la kutimo de sia vilaĝo, li nomis antonomazie la ponton de Lecco. – Ha, kanajla mondo! Sufiĉe; tio, kion volas Dio. –

Li turnis la dorson al tiuj ĉagrenaj objektoj, kaj ekiris, prenante kiel celpunkton la blankeskan makulon sur la monto-deklivo, ĝis li trovos iun, por demandi la ĝustan vojon. Kaj estis vidinde, kun kia senĝeneco li sin turnis al la vojaĝantoj, kaj sen frazturnoj, li nomis la vilaĝon, kie loĝis lia kuzo. El la unua, kiun li demandis, li eksciis, ke al li restas ankoraŭ naŭ mejloj por tramarŝi.

Tiu vojaĝo estis ne gaja. Krom la malfeliĉoj, kiujn Renzo kunportis, lian okulon ĉiumomente malĝojigis ĉagrenaj objektoj, el kiuj li devis konsciiĝi, ke en la lando, kiun li eniras, li trovos malabundon similan al tiu, kiun li forlasis en la sia. Tra la tuta vojo, kaj eĉ pli multe en la vilaĝoj kaj vilaĝegoj, li ĉiu-paŝe renkontis malriĉulojn, kiuj ne de ĉiam estis tiaj, kaj montris la mizeron pli en la vizaĝo ol en la vestaĵo: kampuloj, montaranoj, metiistoj, tutaj familioj; miksa zumado el preĝoj, plendoj, bebo-krietoj. Tiaj vidaĵoj, krom kompatoj kaj malĝojoj, ankaŭ zorgigis lin pri liaj okazaĵoj.

– Kiu scias, – li meditis, – ĉu mi trovos por bonstati? ĉu estos labor-postenoj, kiel en la pasintaj jaroj? Sufiĉe: Bortolo amas min, li estas bonkora knabo, monon gajnis, plurfoje

invitis min; li ne forlasos min. Kaj krome, la Dia Providenco, kiu min helpis ĝis nun; helpos min ankaŭ estontece. –

Intertempe la apetito, jam longtempe vekiĝinte, pliiĝis mejlon post mejlo; kaj kvankam Renzo, kiam li komencis konsideri ĝin, sentis ke li povas, sen grava ĝeno, toleri ĝin dum la ceteraj du aŭ tri mejloj, kiuj supozeble ankoraŭ restis; li pensis, ke ne estas dece sin prezenti almozule al la kuzo, kaj al li diri, kiel unuan komplimenton: donu al mi por manĝi. Li elpoŝigis ĉiujn sian riĉaĵojn, li dismetis ilin sur unu man-plato, li eltiris la sumon. Ne temis pri kalkulo postulanta grandan aritmetikon; sed estis pli ol sufiĉe por fari manĝeton. Li eniris gastejon, por refortikigi la stomakon; kaj fakte, post pago de l' konto, al li ankoraŭ restis kelke da groŝoj.

Elirante, li vidis apud la pordo, kaj en ilin preskaŭ stumblis, du virinojn, surgrunde kuŝantajn pli ol sidantajn; la unuan grandaĝan; la duan pli junan, kun infano, kiu vane suĉinte ambaŭ mamojn ploris kaj ploris; ĉiujn mort-palajn; kaj, apud ili, starantan viron, en kies vizaĝo kaj membroj ankoraŭ videblis la signoj de iama fortikeco, nun venkita kaj preskaŭ estingita de longa mizero. La triopo etendis la manon al la viro, kiu eliris kun firma paŝo kaj revigliĝinta aspekto: neniu ekparolis; kion plian povus esprimi preĝ-peto?

«Ja ĉeestas Providenco!» diris Renzo; kaj tuj metinte la manon en la poŝon, li malplenigis ĝin je tiuj malmultaj groŝoj; kaj metis ilin en la manon, kiun li trovis plej proksima, kaj li pluiris sian vojon.

La manĝo kaj la bonfaro (ĉar ni konsistas el animo kaj korpo) konsolis kaj gajigis ĉiujn liajn pensojn. El tio, ke li fordonis siajn lastajn monerojn, al li venis pli da fidemo por la estonteco, ol se li estus trovinta dekoblon de ili. Ĉar, se la

Providenco, por tiutage vivteni tiujn malfeliĉulojn svenontajn survoje, rezervis ĝuste la lastajn monerojn de homo fremda, fuĝanta, ankaŭ li mem necerta pri sia estonta vivteno; kiu do povus kredi ke Ĝi lasos senrimeda tiun, per kiu Ĝi tion peris, kaj al kiu Ĝi donis pri si tiel vivan, tiel efikan, tiel klaran senton? Tio ĉi estis proksimume la penso de la junulo; sed pli malklara ol kia mi sukcesis ĝin esprimi. Konsiderante, dum la cetera parto de l' vojaĝo, siajn problemojn, ĉio ŝajnis al li pli glata. Iam la malsatego nepre finiĝos: ĉiujare oni tritikrikoltas: dume li havas kuzon Bortolo kaj sian metian lertecon. Aldone al tio, li havis hejme iom da mono, kiun li baldaŭ sendigos. Per ĝi, en plej aĉa supozo, li vivtenos sin tagon post tago, ĝis revenos abundo. – Jen fine denova abundo, – daŭrigis Renzo en sia fantazio: – renaskiĝas labor-fervoro; la mastroj konkuras por dungi Milaniajn laboristojn, kiuj estas la plej lertaj pri l' metio; la Milaniaj laboristoj levas la kreston: kiu volas lertajn homojn, tiu devas ilin pagi; oni gajnas sufiĉe por vivteni pli ol po unu, kaj por ŝpari iom da mono; kaj oni skribigas al la virinoj, ke ili venu... Kaj krome: kial atendi tiom longe? Per la kelka ŝparitaĵo, ĉu oni ne sin vivtenus eĉ tie, dum ĉi-vintro? Tiel ni vivtenos nin ankaŭ tie ĉi. Da pastroj⁹ estas ĉiuloke. Venas do tiuj du karaj virinoj: oni aranĝas hejmon. Kia plezuro, promeni sur tiu ĉi sama vojo, ĉiuj kune! veturi ĝis Adda per kaleŝeto, pikniki ĝuste ĉe-borde, kaj montri al la virinoj la lokon, kie mi enboatiĝis, la veprejon, tra kiu mi desupris, tiun punkton, kie mi gvatis, ĉu ĉeestas boato. –

Li atingas la vilaĝon de la kuzo; enirante, eĉ antaŭ ol enpaŝi, li rimarkas tre altan domon, kun pluraj vicoj de

⁹ *pastroj*: tiuepoke por geedziĝo nepris ĉeesto de pastro.

longegaj fenestroj; li agnoskas ĝin ŝpinejo, li eniras, li demandas laŭtvoĉe, tra la bruoj de la falanta akvo kaj de la radoj, ĉu iu Bortolo Castagneri estas tie.

«Sinjoro Bortolo! Jen tie».

– Ĉu sinjoro? tio estas bona indico, – pensas Renzo; li vidas la kuzon, kaj kuras al li renkonten. Tio sin turnas, rekonas la junulon, kiu al li diras: «jen mi». Surpriz-esprima «ho!», levo de brakoj, reciproka kol-brakumo. Post tiuj unuaj akcepto-salutoj, Bortolo apartigas nian junulon en alian ĉambron, for de la bruaĉo de la labor-aparatoj kaj de la rigardo de l' scivoluloj, kaj al li diras: «volonte mi vidas vin; sed vi estas benata knabo. Tiomfoje mi invitis vin, sed neniam vi volis veni; nun vi alvenas en momento iom kriza».

«Verdire, mi ne foriris miavole», diris Renzo; kaj, kiel eble plej mallonge, sed ne sen multe da emocio, li al tiu rakontis la ĉagrenan historion.

«Tio estas tute alia afero», diris Bortolo. «Ho povra Renzo! Sed vi kalkulis pri mi; kaj mi ne forlasos vin. Verdire, nun-momente oni ne serĉas laboristojn; ĉiu apenaŭ tenas la siajn, por ne ilin perdi kaj kompromiti la entreprenon; sed la mastro amas min, kaj estas riĉo-hava. Kaj verdire li grandparte ŝuldas tion al mi, modeste dirite: li disponigis la kapitalon, kaj mi mian ioman lertecon. Mi estas lia ĉeflaboristo, ĉu vi scias? kaj verdire, mi estas la faktoto¹⁰. Povra Lucia Mondella! Mi ŝin memoras, kvazaŭ estus hieraŭ: bonvirta knabino! ĉiam plej bonteniĝa en preĝejo; kaj kiam oni pasis preter ŝia dometo... Al mi ŝajnas vidi tiun dometon apenaŭ ekster la vilaĝo, kun bela figarbo elstara super la muro...».

«Ne, ne; ni ne parolu pri tio».

¹⁰ *faktoto*: fidinda dungito, kiu prizorgas (preskaŭ) ĉion.

«Mi intencis diri, ke kiam oni pasis ĉe tiu dometo, ĉiam aŭdiĝis tiu fadenvolvido, kiu ruliĝis, ruliĝis. Kaj tia Don Rodrigo! Jam miaepoke li estis sur tia vojo: sed nun li tute diablas, laŭ tio kion mi vidas: dum Dio al li lasas la bridon libera. Do, kiel mi diris, ankaŭ ĉi tie oni iom suferas malsaton... Ĉi-teme, kiel vi statas rilate apetiton?». «Mi manĝis antaŭ nemulte, dumvojaĝe».

«Kaj rilate monon, kiel oni fartas?».

Renzo streĉis unu manon, albuŝigis ĝin, kaj glit-blovetis¹¹ sur ĝin.

«Ne gravas», diris Bortolo: «da ĝi havas mi mem: kaj vi ne zorgu, ĉar tre baldaŭ, ĉe ŝanĝiĝo de l' situacio, se Dio volos, vi redonos, kaj da ĝi superfluos ankaŭ por vi».

«Iomete da ĝi mi havas hejme: mi sendigos ĝin».

«Bone; intertempe kalkulu je mi. Dio al mi donis bonaĵojn, por ke mi bonfaru; kaj se mi ne bonfaras al parencoj kaj amikoj, al kiu do mi bonfaru?».

«Mi ja diris pri la Providenco!» elkriis Renzo, amoplene premante la manon de la bonkora kuzo.

«Do», reparolis ĉi-lasto, «en Milano oni faris tiom da bruaĉo. Ili al mi ŝajnas iom frenezaj. Jes, ankaŭ ĉi tie disvastiĝis onidiroj pri tio; sed mi volas ke vi rakontu al mi la aferon pli detale. He! ni havas multe da aferoj por priparoli. Sed ĉi tie, kiel vi vidas, estas pli kviete, kaj oni aranĝas la aferojn iom pli prudente. La urbo aĉetis dumil besto-ŝarĝojn da tritiko el komercisto loĝanta en Venecio: tritiko el Turkujo; sed se temi pri nutraĵo, oni ne tro subtile konsideras¹². Nun vi aŭdu, kio do estiĝas: estiĝas ke la rektoroj de la urboj Verona

¹¹ *glit-blovetis*: gesto kio signifas: mi havas nur venton, t.e. tute nenion.

kaj Brescia fermas la lim-pasejojn, kaj diras: tra ĉi tie tute ne pasu tritiko. Kion do faras la Bergamanoj? Ili sendas al Venecio Lorenzon Torre: doktoron el plej eminentaj! Li rapide ekiris, sin prezentis al la doĝo, kaj diris: «Kion elpensis tiuj sinjoroj rektoroj?». Kia parolado! onidire presinda kaj publikiginda. Jen kion signifas havi elokventan homon! Jen tuja ordono, ke pasu la tritiko; kaj la rektoroj, ne nur lasu pasi, sed eĉ eskortigu ĝin; kaj nun ĝi estas survoje. Kaj oni pensis ankaŭ pri la kamparo. Sinjoro Giovanbatista Biava, ambasadoro de Bergamo en Venecio (alia granda eminentulo!) komprenigis al la senato, ke ankaŭ en la kamparo oni suferas malsaton; kaj la senato disponigis kvarmil buŝelojn da milio¹³. Ankaŭ ĝi povas helpi por konsistigi panon. Kaj krome, ĉu vi volas jenon ekscii? Se ni ne havos panon, ni manĝos kunpanaĵon. La Di-Sinjoro al mi donis bonaĵojn, mi ripetas. Nun mi kondukos vin al mia mastro: mi al li parolis pri vi plurfoje, kaj li al vi faros bonan akcepton. Temas pri bonkora Bergamano laŭ antikva moro, homo kun vasta koro. Verdire, nuntempe li ne atendis vin; sed kiam li aŭdos vian historion... Kaj krome la laboristojn li scias teni, ĉar malsato forpasas, sed negoco plu-daŭras. Sed antaŭ ĉio, necesas ke mi avertu vin pri unu afero. Ĉu vi scias, kiel en tiu ĉi lando oni nomas nin, la almigrintojn el la Milania ŝtato?». «Kiel oni nomas nin?».

«Oni nomas nin anseroj».

«Ne estas bela nomo».

«Sed nu, tiel estas: kiu naskiĝis en la Milana teritorio, kaj volas vivi en la Bergama, tiu devas ĝin akcepti tute pace. Laŭ

¹² *Turkujo...konsideras*: Turkujo, islama lando, estis tradicie malamika de kristanoj.

¹³ *milio*: greno foje uzita anstataŭ tritiko.

ĉi tieaj homoj, nomi ansero Milananon, estas kiel titoli eminentega kavaliron.

«Mi supozas, ke oni tiel nomos tiujn, kiuj tion toleras».

«Mia kara knabo, se vi ne estas preta suĉi tiun ŝerc-nomon ĉiuhore, ne planu vivi ĉi tie. Oni devus daŭre tenadi tranĉilon: kaj eĉ se, supozeble, vi murdus du, tri, kvar da ili, fine venus iu, kiu murdus vin: kaj do, kia plezuro aperi antaŭ la Dia juĝo kun tri aŭ kvar murdoj sur sia animo!».

«Kaj kio pri Milanano, kiu havus iom da...» ĉe tio li frapis al si la frunton per la fingro-pinto¹⁴, kiel li faris en la drinkejo je la plenluno. «Mi volas diri: homo tre lerta pri sia metio?».

«Tute indifere: ĉi tie estas ansero ankaŭ li mem. Ĉu vi scias kiel diras mia mastro, kiam li parolas pri mi kun siaj amikoj? Li diras: – Tiu ansero estis Dia providencaĵo por mia entrepreno; se mi ne havus tiun anseron, mi estus tre implikita. – Tia estas la kutimo».

«Stulta kutimo. Kaj vidinte tion, kion ni kapablas fari (ĉar entute, ni mem importis tien ĉi la metion, kaj ĝin funkciigas!), ĉu eblas, ke ili ne korektis sin?».

«Ĝis nun ne: ĉe l' tempo-paso povas esti, ĉe la kreskantaj knaboj; sed ĉe la plenkreskuloj, la afero estas sen-rimeda: tiun mis-kutimon ili lernis, kaj ne plu forlasos. Kio estas entute? Tute alia afero estis la galantaĵoj al vi faritaj, kaj la pluo, kiun niaj karaj sampatrujanoj intencis al vi fari».

«Jes ja, tio veras: se krom tio ne estas alia malbono...».

«Se vi estas konvinkita pri ĉi tio, nun ĉio iros glate. Venu al la mastro, kaj kuraĝe».

Ĉio fakte iris glate kaj laŭ la promesoj de Bortolo, tiel ke ni opinias superflue fari detalan raporton. Kaj estis vere

¹⁴ per la fingro-pinto: gesto kiu signifas grandan cerbon.

providence; ĉar ni tuj vidos, kiom estis konfidine pri la havaĵoj kaj moneroj, kiujn Renzo lasis hejme.

XVIII

En tiu sama tago, la 13-a de novembro, alvenas al sinjoro urbestro de Lecco speciala mesaĝisto, kiu al li prezentas depeŝon de sinjoro justic-kapitano, kun ordono fari ĉiun eblan kaj oportunan enketon, por malkovri, ĉu junulo nome Lorenzo Tramaglino, silko-ŝpinisto, eskapinta el la armitaj fortoj *praedicti egregii domini capitanei*, revenis, *palam vel clam*, al sia vilaĝo, *ignotum* pri kiu vilaĝo ĝuste temas, *verum in territorio Leuci: quod si compertum fuerit sic esse*, klopodu menciita sinjoro urbestro, *quanta maxima diligentia fieri poterit*,¹ kapti lin, kaj, liginte lin laŭdeve, *videlizet*² per fortikaj man-katenoj, konsidere ne-sufiĉon, por menciita subjekto, de manumoj, kondukigu lin en malliberejojn, kaj tie li retenu lin zorge gardata, por lin liveri al homo sendota lin preni; kaj ĉu kaze ke jes, ĉu kaze ke ne, *accedatis ad domum praedicti Laurentii Tramaliini, et, facta debita diligentia, quidquid ad rem repertum fuerit auferatis; et informationes de illius prava qualitate, vita, et complicibus sumatis*; kaj pri ĉio dirita kaj farita, trovita kaj ne trovita, forprenita kaj lasita, *diligenter referatis*.³ Sinjoro urbestro, laŭpove konstatinte, ke la subjekto ne revenis al la vilaĝo, venigas la vilaĝestron, kaj al li ordonas

¹ *praedicti... poterit*: burokrata latina lingvo = de menciita sinjoro kapitano, revenis, malkaŝe aŭ kaŝe, al sia vilaĝo, nekonate, pri kiu vilaĝo ĝuste temas, ĉiuokaze en teritorio de Lecco: kaj se estos konstatite ke tiele afero statas, klopodu menciita sinjoro urbestro, kiel eble plej diligente...

² *videlizet* = tio estas

³ *accedatis... referatis* = aliru al domo de menciita Lorenzo Tramaglino kaj, aplikinte laŭdevan diligentecon, forportu ĉion ajn trovotan koncerne aferon; kaj kolektu informojn pri liaj malica kvalito, vivo kaj komplikoj; kaj pri ĉio dirita kaj farita, trovita kaj ne trovita, forprenita kaj lasita, diligente vi raportu.

konduki lin al la menciita domo, kun granda sekvantaro de notario kaj sbiroj. La domo ŝlosita estas; la havanto ŝlosilojn forestas aŭ intence malaperis; oni disrompas la pordon; oni aplikas laŭdevan diligentecon, tio estas, oni faras kiel pri sturmita urbo. La famo pri tiu ekspedicio tuj disvastiĝas tra l' tuta ĉirkaŭaĵo; ĝi atingas la orelojn de patro Cristoforo; kiu konsternite ne malpli ol afliktite, demandas trian kaj kvaran homon, por ricevi klarigon pri la kaŭzo de tiom neatendita okazaĵo; sed li nenion kolektas krom aerajn konjektojn, kaj li tuj skribas al patro Bonaventura, el kiu li esperas ekscii ion pli precizan. Dume la parencoj kaj amikoj de Renzo estas venigitaj depozicii, kion do ili scias pri lia *malica kvalito*: nomiĝi Tramaglino aspektas kiel malfeliĉo, honto, krimo: la vilaĝo estas konsternita. Iom post iom oni ekscias, ke Renzo eskapis el la justico, tute meze de Milano, kaj poste malaperis; diskuras onidiro, ke li faris ian grandan misfaron; sed oni ne scias kion, aŭ oni ĝin rakontas en cent diversaj manieroj. Ju pli granda, des malpli oni ĝin kredas en la vilaĝo, kie Renzo estas konata kiel bonmora junulo: la plimulto supozas, kaj reciproke flustras ĉe l' orelo, ke estas maĥinacio de l' perfortema Don Rodrigo, por ruinigi lian povran rivalon. Tio pruvas ke, juĝante per indukto, kaj sen laŭdeva kono de l' faktoj, oni foje faras gravan maljustaĵon eĉ al kanajloj.

Sed ni, havante tieldire la faktojn ĉe-mane, povas aserti ke, se Don Rodrigo tute ne partoprenis en ĉi-malfeliĉo de Renzo, li tamen pri ĝi plezuriĝis, kvazaŭ ĝin estus farinta li mem, kaj pri ĝi li fanfaronis kun la intimuloj, ĉefe kun grafo Attilio. Ĉi-lasto, laŭ siaj unuaj planoj, tiam devus jam esti en Milano; sed, ĉe l' unuaj sciigoj pri la tumulto, kaj pri la kanajlaro vaganta tra la stratoj tute ne dispona ricevi baston-

batojn, taksis oportune resti en la kamparo, ĝis la aferoj kvietigis. Des pli ke, ofendinte multe da homoj, li havis kialojn por timi, ke kelkiu el la multaj, ĝis nun kvietaj pro senpoveco, elprofitus la cirkonstancojn por aŭdaci, kaj taksus la momenton oportuna fari venĝojn por ĉiuj. Tiu ĉi prokrasto ne estis longdaŭra: la ordono veninta el Milano, dispozicii kontraŭ Renzon, indicis ke la aferoj reakiris la ordinaran fluon; kaj preskaŭ samtempe oni ricevis pri tio pozitivan konfirmon. Grafo Attilio foriris tuj-tuje, instigante la kuzon persisti en la entrepreno, kontentigi la puntilion, kaj promesante ke siaflanke li tuj klopodos malimpliki lin el la kapuceno; al ĉi-lastata afero mirinde favoris la bonvena akcidento trafinta lian aĉegan rivalon. Tuj post la foriro de Attilio, el Monza revenis tute sana kaj sendifekta la Grizulo, kiu raportis al sia mastro tion, kion li sukcesis kolekti: ke Lucia estas rifuĝinta en tiu tia monakinejo, sub protekto de tiu tia senjorino; kaj ŝi restas daŭre kaŝita, kvazaŭ estus ankaŭ ŝi mem monakino, neniam elpaŝante ekster la pordon, kaj partoprenante la preĝejajn Di-servojn el krado-hava fenestreto:⁴ afero kiun bedaŭris multaj, kiuj, aŭdinte babili mi ne scias kion pri ŝiaj aventuroj, kaj diri mirindaĵojn pri ŝia vizaĝo, deziris videti, kiel ĝi fakte aspektas.

Tiu ĉi raporto enmetis diablون en Don Rodrigon, aŭ pli ĝuste, igis pli rabia tiun, kiu jam enloĝis. Multe da cirkonstancoj favoraj al lia intenco pli kaj pli ardigis lian pasion, tio estas tiun miksaĵon el puntilio, rabio, kaj fia kaprico, kiuj tiun pasion konsistigis. Renzo estis fora, eldomigita, ekzilita, tiel ke ĉia faro kontraŭ li fariĝus lica, kaj

⁴ *fenestreto*: kradita fenestro, kiu ebligis partopreni je Di-servoj, ne enirante monakinejon, en kiun neniu fremdulo rajtis eniri.

eĉ lian fianĉinon oni povus iamaniere konsideri havaĵ' de ribelulo⁵; tiu rabia kapuceno, la ununura homo en la mondo, kiu volus kaj povus por ŝi pledi, kaj fari bruon aŭdeblan eĉ malproksime kaj ĉe altranguloj, verŝajne estos ankaŭ li mem baldaŭ malebligita noci. Kaj jen nova malhelpo, kiu ĉiujn avantaĝojn ne nur kontraŭpezis, sed, oni povus diri, igis senefikaj. Monakinejo en Monza, eĉ sen ĉeesto de princino, estis osto tro malmola por Don Rodrigo; kaj kiom ajn li zumis per la fantazio ĉirkaŭ tiu rifuĝejo, li ne povis imagi vojon aŭ rimedon por konkeri ĝin, nek perforte nek embuske. Li jam estis rezignonta la entreprenon, li jam estis decidonta iri al Milano, eĉ pli long-voje, por eĉ ne pasi tra Monza; kaj en Milano, sin allasi al amikoj kaj diboĉoj, por forpeli, per pensoj tute gajaj, tiun jam tute turmentan penson. Sed, sed, sed... rilate amikaron; trankvile, koncerne ĉi-amikojn! Anstataŭ distraĵo, el tiu amikaro li povus atendi novajn ĉagrenojn: ĉar Attilio supozeble jam distrumpetis la aferon, kaj atendigis ĉiujn. Ĉiuflanke oni faros al li demandojn pri la montaranino: endos doni konton. Oni planis, oni provis; kaj kion oni efikis? Oni surprenis puntilion: iom malnoblan, verdire: sed nu, ne ĉiam oni povas siajn kapricojn regi; gravas ilia kontentigo; kaj kiel oni elturniĝas el puntilio? Per kapitulaco antaŭ kampulaĉo kaj frataĉo! Hu! Kaj kiam neatendita bonŝanco forigis la kampulaĉon sen ajna klopodo flanke de li, la sentaŭgulo; kaj lerta amiko forigis la monakon, tiam li, la sentaŭgulo, ne kapablis elprofiti la situacion, kaj malbrave retretis el la entrepreno. Pli multas ol bezone kialoj, por ne plu levi la vizaĝon⁶ inter la honestuloj, aŭ por havi ĉiu-momente glavon

⁵ *havaĵ' de ribelulo*: ribeluloj perdis ĉian proprieto-raĵton.

⁶ *ne plu levi la vizaĝon*: pro honto.

enmane. Kaj krome, kiel reveni, aŭ kiel resti en tiu vilao, en tiu vilaĝo, kie, krom la senĉesaj pikaj memoroj pri la pasio, lin akompanos la honto pro fiaskinta atenco? kie kreskos la publika malamo, kaj samtempe malpliiĝos la konsidero pri lia potenco? kie, sur la mieno de ĉia malbravulo, eĉ meze de kliniĝoj, oni povus legi maldolĉan: vi glutaĉis ĝin, mi ĝojas? La vojo de malvirto, diras ĉi tie nia manskribaĵo, estas larĝa; sed tio ne signifas, ke ĝi estas komforta: ĝi ja havas siajn malhelpojn, siajn malglatajn pasejojn; ĝi estas grandparte ĉagrena, kaj peniga, malgraŭ tio, ke ĝi iras malsupren.

En la kapon de Don Rodrigo, kiu ne volis rezigni, nek retreti, nek halti, kaj aliflanke per si mem ne povis plu-iri, verdire venis penso pri rimedo, per kiu li sukcesus: tio estas peti helpon de viro, kies manoj ofte atingis tien, kien ne kapablis la rigardo de aliaj: temis pri viro aŭ diablo, kiu des pli volonte sin devigis al entreprenoj, ju pli malfacilaj ili estis. Sed tiu ĉi solvo havis ankaŭ malavantaĝojn kaj riskojn, des pli gravajn, ju malpli prognozeblajn; ĉar neniu povus antaŭscii, kien oni atingos post eventuala alianciĝo kun tia viro, kiu certe estis potenca help-soldato, sed ne malpli absoluta kaj danĝera kondotiero.

Tiaj pensoj dum pluraj tagoj hezitis Don Rodrigon inter jeso kaj neo, ambaŭ tre ĝenaj. Alvenis intertempe letero de la kuzo, kiu sciigis, ke la intrigo estas feliĉe startigita. Nemulte post la fulmo, eksplodis la tondro; tio estas, ian belan matenon aŭdiĝis ke patro Cristoforo forlasis la kapucenejon de Pescarenico. Tiu tuja sukceso, la letero de Attilio, kiu estis tute kuraĝiga kaj minacis grandajn mokojn, pli kaj pli inklinigis Don Rodrigon al la riska solvo: la lastan instigon donis la neatendita sciigo, ke Agnese revenis hejmen: malplia

obstaklo apud Lucia. Ni raportu la du okazaĵojn, komencante per ĉi-lasta.

Apenaŭ la du kompatindaj virinoj sin aranĝis en sia rifuĝejo, subite disvastiĝis tra Monza, kaj do ankaŭ en la monakinejo, la sciigo pri tiu frakaso en Milano; kaj malantaŭ la granda novaĵo, senfina aro da detaloj, kiuj de moment' al momento pliiĝis kaj variiĝis. La farmistino, kiu el sia hejmo povis teni unu orelon streĉita al la strato, kaj duan al la monakinejo, kolektis diversloke sciigojn, kaj komunikis ilin al la gastinoj. «Oni enkarcerigis du, ses, ok, kvar, sep virojn; oni pendumos ilin, parte antaŭ la bakejo de l' *lambastonoj*, parte komence de la strato kie staras la domo de l' proviantestro... He, he, vi aŭdu jenon! Eskapis iu, kiu devenas el Lecco aŭ ties teritorio. Lian nomon mi ne scias; sed verŝajne venos homo, kiu povos al mi diri ĝin; por vidi, ĉu vi konas lin».

Tiu ĉi sciigo, kune kun la cirkonstanco, ke Renzo atingis Milanon ĝuste en tiu fatala tago, iom maltrankviligis la du virinojn, ĉefe Lucia-n; sed vi imagu kio ekestis, kiam la farmistino venis diri al ili: «estas ĝuste el via vilaĝo la viro kiu eskapaĉis, por eviti pendumon: silko-ŝpinisto, kiu nomiĝas Tramaglino: ĉu vi konas lin?».

Je Lucia, kiu sidis, orlante⁷ mi ne scias kion, la kudraĵo elfalis de-mane, ŝia vizaĝo paliĝis, kaj tute ŝanĝiĝis, tiel ke la farmistino tion certe rimarkus, se ŝi estus pli proksima. Sed ŝi staris ĉe-sojle kun Agnese; kiu, ankaŭ ŝi mem konfuzita, sed ne tiel multe, sukcesis tamen sin regi forte; kaj, por doni ajnan respondon, ŝi diris ke en vilaĝeto ĉiuj konas ĉiujn, kaj do ŝi konas lin; sed ke ŝi ne scipovas imagi, kiel tiaĵo povis trafi lin;

⁷ *orlante*: farante *orlon*, kiu estas rando de ŝtofo faldita kaj kudrita, por eviti disfadeniĝon.

ĉar temas pri prudenta junulo. Poste ŝi demandis, ĉu certe li eskapis, kaj kien.

«Ke li eskapis, ĉiuj diras; kien, oni ne scias: povas esti ke oni ankoraŭ lin kaptos, povas esti ke li elsaviĝis; sed se li refalas sub iliajn ungegojn, via prudenta junulo...».

Ĉe tio bonŝance oni la farmistinon forvokis, kaj ŝi foriris: imagu kiel estis impresitaj panjo kaj filino. Dum pluraj tagoj la povra virino kaj la senkonsola knabino devis resti en tia necerteco, konjektante pri kiel, pri kial, pri postsekvoj de tiu ĉagrena okazaĵo, tiujn terurajn vortojn komentante en si mem, aŭ mallaŭte fluŝtrante reciproke, kiam tio eblis.

Fine ian ĵaŭdon alvenis al la monakinejo viro, serĉe al Agnese. Temis pri fiŝisto el Pescarenico, iranta laŭ-kutime al Milano, por vendi sian varon; kaj la bonkora frato Cristoforo lin estis petinta, ke, pasante tra Monza, li faru viziteton al la monakinejo, salutitu la virinojn liaflanke, rakontu al ili tion, kion oni scias pri la ĉagrena kazo de Renzo, li rekomendu, ke ili paciencu, kaj fidu al Dio; kaj ke li, povra frato, tute ne forgesos ilin, kaj gvatos la oportunon, por ilin helpi; kaj dumtempe li ne neglektos havigi al ili sciigojn per tiu peranto aŭ ali-maniere. Pri Renzo, la sendito nenion novan kaj certan scipovis raporti, krom la viziton faritan en lia hejmo, kaj la esplorojn por lin kapti; sed ke ĉi-lastaj tute fiaskis, kaj oni certe scias, ke li malimplikis sin, rifuĝante en la Bergaman teritorion. Tiu ĉi certaĵo memkompreneble estis granda balzamo por Lucia: ek de tiam ŝiaj larmoj fluis pli facilaj kaj dolĉaj; ŝi sentis pli grandan konsolon en la sekretaj kor-elverŝoj kun la patrino; kaj en ĉiuj ŝiaj preĝoj ne mankis danko al Dio.

Gertrude ofte ŝin venigis en sian privatan vizitejon, kaj

foje tie ŝin tenis longe, plezuriĝante je l' naivo kaj dolĉeco de l' povrulino, kaj pro tio ke ĉi-lasta ĉiumomente ŝin dankis kaj benis. Ŝi krome rakontis konfidence al Lucia unu parton (la kristalpuran parton) de sia historio, pri tio kion ŝi suferis, por veni suferi ĉi tie: kaj la komenca suspektema miro de Lucia rilate ŝin, iom post iom ŝanĝiĝis al kompto. Ŝi trovis en tiu historio pli ol sufiĉajn kialojn, por klarigi la ioman strangecon de ŝia bonfarantino; des pli helpite de tiu teorio de Agnese pri l' cerboj de l' senjoroj. Kvankam sentante sin ema reciproki la konfidencon de Gertrude, tamen eĉ ne tuŝis ŝian kapon la penso paroli al ŝi pri siaj novaj zorgoj, pri sia nova malfeliĉo, diri al ŝi, kiu do estas tiu forkurinta ŝpinisto; por ne riski disvastigi onidiron tiom ĉagrenan kaj skandalan. Krom tio, ŝi laŭpove sin ŝirmis de l' scivolaj demandoj de Gertrude pri ŝia historio antaŭ la geedziĝo-promeso; sed motivo de tio ne estis singardeco. Vera kaŭzo estis, ke al la povra senkulpulino tiu historio ŝajnis pli dorna, pli malfacile direbla ol ĉiuj, kiujn ŝi aŭdis, aŭ ŝi imagis ke ŝi povos aŭdi el la senjorino. En ĉi-lastaj estis tiraneco, insidoj, suferoj: aferoj aĉaj kaj doloraj, sed tamen mencieblaj laŭnome; en la ŝia estis ĉie kunmiksita sento, vorto, kiun ŝi taksis ne eldirebla, parolante pri si mem; kaj por kies esprimo neniam ŝi trovos anstataŭan frazturnon, kiu al ŝi ne ŝajnus senpudora: la amo!

Kelkfoje Gertrude preskaŭ koleretis pro tia deteniĝo; en ĝi tamen travidiĝis tiom da amemo, da respekto, da dankemo, kaj eĉ tiom da fido! Kelkfoje tiu pudoro tiel delikata, tiel tim-senta, eble al ŝi malplaĉis pro alia kialo⁸; sed ĉio perdiĝis en la dolĉeco de penso, kiu ĉiumomente en ŝin revenis, kiam ŝi

⁸ *alia kialo*: ĉar la ĉasteco de Lucia estis senintenca riproĉo al la malmorala konduto de la monakino.

rigardis Lucia-n: – al ŝi mi bonfaras –. Kaj tio veris; ĉar, krom la rifuĝigo, tiuj paroloj, tiuj familiaraj karesoj havigis ne etan konsolon al Lucia. Ĉi-lasta trovis alian konsolon el senĉesa laboro; kaj daŭre ŝi petegis doni al ŝi ion por fari: eĉ en la vizitejo, ŝi ĉiam kunportis laboraĵon, por daŭre okupi la manojn: sed kiel sin enŝovas ĉien ajn ĉagrenaj pensoj! kudrante kaj kudrante, kio estis por ŝi preskaŭ nova metio, de temp' al tempo revenis en ŝian menson ŝia haspelo; kaj malantaŭ la haspelo, kiom da memoroj!

La duan ĵaŭdon, revenis tiu fiŝisto, aŭ alia sendito, kun salutoj de patro Cristoforo, kaj kun la konfirmo pri la feliĉa forkuro de Renzo. Sed pri liaj misaventuroj, neniam pli pozitiva informo; ĉar, kiel ni diris al la leganto, la kapuceno esperis ricevi sciigojn el sia kunmonako el Milano, al kiu li estis rekomendinta lin; kaj ĉi-lasta respondis ke li vidis nek la viron nek la leteron; ke kamparano ja venis al la kapucenejo, serĉante lin; sed ke, ne lin trovinte, li foriris, kaj ne plu aperis.

La trian ĵaŭdon neniam vidiĝis; kaj por la povrulinoj tio estis ne nur manko de dezirata kaj esperata konsolo, sed, kiel pro ĉia bagatelaĵo kutime okazas ĉe afliktitoj kaj implikitoj, tio estis kaŭzo de maltrankvilo, de cent ĝenaj suspektoj. Jam antaŭe Agnese pensis fari viziteton hejmen; tiu ĉi novaĵo, ke ne vidiĝis la promesita ambasadoro, ŝin decidigis. Por Lucia estis serioza afero resti for de l' jupo de panjo; sed la dezirego ion ekscii, kaj la sekureco, kiun ŝi sentis en tiu tiom gardata kaj sankta azilo, venkis ŝiajn malinklinojn. Kaj estis decidite, ke morgaŭ Agnese iros atendi surstrate la fiŝiston, kiu tra tie devos pasi, revene el Milano; kaj ŝi petos sid-lokon sur la kaleŝeto, por veturi al siaj montoj. Fakte ŝi trovis lin, kaj lin demandis, ĉu patro Cristoforo ne donis al li komision por ŝi; la

fiŝisto kiu la tutan hieraŭon pasigis fiŝ-kaptante, eksciis nenion pri la patro. La virino ne devis insisti, por ricevi la deziratan komplezon: ne sen larmoj ŝi adiaŭis la senjorinon kaj la filinon, promesante tuj sendi siajn sciigojn, kaj baldaŭ reveni; kaj ŝi forveturis.

Dum-vojaĝe nenio rimarkinda okazis. Ili ripozis dum parto de la nokto en gastejo, laŭkutime; ili denove ekvojaĝis antaŭ la tagiĝo; kaj alvenis frumatene al Pescarenico. Agnese elkaleŝiĝis sur la monakeja placeto, forsalutis ŝian veturiginton, plurfoje ripetante: «rekompencu vin Dio»; kaj, ĉar ŝi estis ĝuste tie, ŝi decidis viziti sian bonkoran fraton bonfaranton, antaŭ ol iri hejmen. Ŝi sonorigis la tintilon; venis malfermi frato Galdino, tiu de la nuksoj.

«Ho! mia kara, kia vento vin alportis?».

«Mi venas serĉi patron Cristoforo».

«Ĉu patro Cristoforo? Li ne ĉeestas».

«Ho! Ĉu tre malfrue li revenos?»

«Ba...?» diris la frato, levante la ŝultrojn, kaj retirante la razitan kapon en la kapuĉon.

«Kien li iris?».

«Al Rimini».

«Kien?»

«Al Rimini».

«Kie estas tiu vilaĝo?».

«He he he!» respondis la frato, tranĉante vertikale la aeron per etendita mano, por signifi grandegan distancon.

«Ho ve al mi! Sed kial li foriris tiel subite?».

«Ĉar tion volis la patro provincialo».

«Kaj kial forsendi lin, kiu tiom multe bonfaradis ĉi tie? Ho Sinjoro!».

«Se la superuloj devus pravigi la ordonojn, kiujn ili donas, kie do estus obeemo, mia kara?».

«Jes; sed ĉi tio estas mia ruinigo».

«Ĉu vi scias, kio verŝajne okazis? Verŝajne okazis, ke en Rimini oni bezonis lertan predikiston (tiajn ni havas ĉie; sed foje oni bezonas cel-taŭgan viron); verŝajne tiu provincialo skribis al provincialo de ĉi tie, demandante, ĉu li havas personon tian kaj tian; kaj verŝajne nia patro provincialo diris: por tio bezonatas patro Cristoforo. Verŝajne okazis ĝuste ĉi tiel, vidu».

«Ho ve al ni! Kiam li foriris?».

«Antaŭ-hieraŭ».

«Jen! se mi estus sekvinta mian inspiriĝon, foriri kelktage pli frue! Kaj ĉu oni ne scias, kiam eble li revenos? kiam, proksimume?».

«He, mia kara! Tion scias la patro provincialo; se almenaŭ li mem tion scias. Kiam unu el niaj patroj predikistoj ekflugis, ne eblas prognozi, sur kia branĉo li sidiĝos. Oni serĉas ilin tie kaj ĉi tie: kaj ni havas kapucenejojn en la kvar mondo-partoj. Supozu ke, en Rimini, patro Cristoforo faros grandan bruon per sia karesma predikado: ĉar li ne ĉiam predikas improvize, kiel li faris ĉi tie, por fiŝkaptistoj kaj kampuloj: por la urbaj predikejoj, li havas siajn bele skribitajn predikojn: eminentajn aferojn. Famo disvastiĝas, en tiuj regionoj, pri tiu ĉi granda predikisto; kaj povas esti ke oni petas lin el... el kion mi scias? Kaj tiam oni devas lin sendi tien; ĉar ni vivas el la almozo de la tuta mondo, kaj do konvenas ke ni al la tuta mondo servas».

«Ho Sinjoro! Sinjoro!» elkriis denove Agnese, preskaŭ plorante: «kion do mi faru, sen tiu viro? Li estis por ni kiel patro! Por ni estas ruinigo».

«Aŭskultu, bona virino; patro Cristoforo estis vere homo; sed ni havas aliajn, ĉu vi scias? plenajn de karitato kaj talento, kaj kapablajn trakti kaj kun senjoroj kaj kun malriĉuloj. Ĉu vi volas patron Atanasio? ĉu vi volas patron Girolamo? Ĉu vi volas patron Zaccaria? Vidu, patro Zaccaria estas valora viro. Kaj tute ne konsideru, kiel certaj stultuloj, ke li estas tiel minca, kun falseta⁹ voĉeto, kaj tute maldensa barbeto: mi ne diras por prediki, ĉar ĉiuj havas diversajn donojn; sed por konsili, li estas vere homo, ĉu vi scias?

«Ho, pro amo al Dio!» elkriis Agnese, kun la miksitaj dankemo kaj malpacienco, kiaj estiĝas ĉe propono, en kiu oni vidas alies bonintencon pli ol sian avantaĝon: «kiom interesas min, kia homo estas aŭ ne estas aliulo, kiam tiu povrulo, kiu ne plu ĉeestas, estis tiu, kiu sciis niajn aferojn, kaj preparis ĉion, por helpi nin?».

«Tiam oni devas pacienci».

«Tion mi ja scias», respondis Agnese: «pardonu la ĝenon».

«Pri kio do, mia kara? Mi bedaŭras vin. Kaj se vi decidis serĉi iun el niaj patroj, la kapucenejo staras ĉi tie, tute senmova. He, mi vidigos min baldaŭ, por kvesto de oleo».

«Fartu bone», diris Agnese; kaj ŝi ekiris al sia vilaĝeto, senkonsola, konfuza kaj konsternita, kiel kompatinda blindulo perdinta sian bastonon.

Ni, informite pli bone ol frato Galdino, povas diri, kiel fakte iris la afero. Attilio, tuj kiam li atingis Milanon, iris, laŭ sia promeso al Don Rodrigo, fari viziton al ilia komuna onklo, membro de la sekreta Konsilio (temis pri konsilantaro,

⁹ *falseta*: akresona.

tiuepoke el dek tri togitaj kaj glavitaj¹⁰ viroj, ĉe kiu la guberniestro ĉerpis konsilojn, kaj kiu, ĉe eventuala morto aŭ ŝanĝo de guberniestro, surprenis intertempan regadon). La grafo onklo, togito, kaj unu el la plej aĝaj en la konsilio, ĝuis en ĝi iometan konsideron; sed li estis tute senkompara ĉe ties elprofito kaj elmonro al ceteraj. Paroli ambigue, silenti signifoplene, diri senkonklude, prem-fermi l' okulojn por esprimi: mi ne povas paroli; flati senpromese, minaci ceremonie; ĉio tien celis; kaj ĉio pli-malpli efikis pozitive. Tiomgrade ke, eĉ frazo ĉi-speca: pri tiu ĉi afero mi estas tute senpova, foje dirita ĉar tio estis pura vero, sed eldirita tiamaniere, ke oni ne lin kredis, fakte pliigis lian opiniatan, kaj do faktan potencon: kiel tiuj skatoloj, foje ankoraŭ videblaj en malnovaj apotekistaj butikoj, kun surskribitaj arabaj vortoj, sed interne malplenaj; ili tamen utilas por gardi prestiĝon al la butiko. La prestiĝo de l' grafo onklo, delonge kreskanta per tute lantaj gradoj, lastatempe faris laŭdire gigantan suprenpaŝon per unu fojo, pro eksterordinara evento, tio estas, vojaĝo al Madrido, kun misio ĉe la kortego; kian akcepton li tie ricevis, oni devus aŭdi lin mem rakonti. Interalie: la grafo duko traktis lin kun speciala degno, kaj allasis lin al sia konfidenco, tiagrade ke foje, je l' ĉeesto, oni povus diri de preskaŭ duona kortego, li demandis lin, kiel al li plaĉas Madrido, kaj alifoj al li diris vizaĝ-al-vizaĝe, apud fenestra embrazuro, ke la Milana katedralo estas la plej granda templo en la reĝaj ŝtatoj.

Attilio faris al grafo onklo siajn komplimentojn, kaj prezentis tiujn de la kuzo; poste li aldonis, kun serioza sinteno,

¹⁰ *togitaj kaj glavitaj*: apartenantaj respektive al la juĝistaro kaj al la armeo.

kian li siatempe kapablis alpreni: «mi kredas, ke estas mia devo, sen perfidi la konfidencon de Rodrigo, averti senjoron onklon pri afero, kiu, se via moŝto ne aplikas rimedon, povus fariĝi serioza, kaj kuntreni sekvaĵojn...». «Unu el liaj misfaroj, mi imagas».

«Verdire ĉi-foje la malpravo ne estas flanke de mia kuzo. Sed li estas incitita; kaj, mi ripetas, nur senjoro onklo povas...». «Ni vidu, ni vidu».

«Vivas en tiu teritorio kapuceno, kiu kontraŭas al Rodrigo; la afero atingis tian gradon ke...». «Kiomfoje mi diris al vi ambaŭ, lasi la monakojn boli en ilia buljono¹¹? Sufiĉas la zorgoj, kiujn ili kaŭzas al devigitoj... al taskitoj...». Kaj ĉe tio li spiroblovis. «Sed vi mem, kiuj povas ilin eviti...».

«Sinjoro onklo, ĉi-teme mi devas diri, ke Rodrigo evitus lin, se li povus. La frato mem havas ion kontraŭ lin, kaj komencis lin provoki ĉiamaniere...».

«Kion diable havas tiu frataĉo kontraŭ mian nevon?».

«Antaŭ ĉio, li estas malkvieta kapo, kaj konata kiel tia, kaj profesie li atakas kavalirojn. Li protektas, gvidas, kion mi scias? tiean kampulinaĉon; kaj rilate ŝin li havas karitaton, karitaton... mi ne diru hipokritan, sed tre ĵaluzan, suspektaman, ofendsentan».

«Mi komprenas», diris grafo onklo: kaj sur la plumpa fono de lia vizaĝo, pentrita per la naturo, kaj pliposte vualita kaj stukita plur-tavole per diplomateco, ekfulmis radio de malico, kiu aspektis belege.

«Nu, ek de kelke da tempo, tiu ĉi frato supozaciis, ke Rodrigo havas mi ne scias kiajn intencojn super ĉi tiu...».

«Supozaciis, supozaciis: ankaŭ mi mem konas senjoron

¹¹ lasi boli... buljono: ĉi tie, tute ne ĝeni.

Don Rodrigo, kaj li bezonas alian plediston ol vian moŝton, por lin pravigi ĉi-teme».

«Senjoro onklo, mi ne hezitus kredi, ke Rodrigo faris eventualan ŝercon al tiu kreitaĵo, renkontante ŝin survoje: li estas junulo, kaj entute li ne estas kapuceno; sed temas pri bagateloj, pri kiuj ne konvenas okupi senjoron onklon: la serioza afero estas, ke tiu frato komencis paroli pri Rodrigo, kiel oni farus pri fiulo, kaj li klopodas instigi kontraŭ lin la tutan vilaĝon...».

«Kaj kio la aliaj monakoj?».

«Ili ne enmiksas sin, ĉar ili konas lin varma kapo, kaj ili tute respektas Don Rodrigon; aliflanke tiu ĉi frato ĝuas grandan prestiĝon ĉe l' kampuloj, ĉar li rolas ankaŭ kiel sanktulo, kaj...». «Mi imagas, ke li ne scias, ke Rodrigo estas mia nevo».

«Li tute scias! Ĝuste tio eĉ plimulte enmetas diablon en lin».

«Kiel? kiel?».

«Ĉar, kaj tion li mem diradas, li des pli multe plezuriĝas spitante Don Rodrigon, ĝuste pro tio ke li havas naturan protektanton prestiĝan kia estas via moŝto: kaj ke li primokas eminentulojn kaj politikistojn, kaj ke la ŝnurzono de sankta Francisko tenas ligitaj eĉ glavojn, kaj ke...».

«Ho temerara frataĉo! Kiel li nomiĝas?».

«Frato Cristoforo el ***», diris Attilio; kaj grafo onklo, preninte el tirkesto de sia tablo not-libreton, skribis en ĝi, blovante kaj blovante, tiun povran nomon. Dume Attilio daŭrigis: «Ĉiam tia estis lia temperamento: lia vivo estas konata. Li estis plebano, kiu, akirinte kelke da moneroj, intencis rivali kun la kavaliroj de sia loĝloko; kaj el kolero pro tio ke li ne sukcesis

supervenki ĉiujn, li murdis unu el ili: sekve de tio, por eviti pendumilon, li monakiĝis».

«Ho brave! Ho bone! Oni vidos, oni vidos», diris grafo onklo, plu blovante.

«Kaj nun», daŭrigis Attilio, «li koleregas, ĉar fiaskis plano por li gravega: kaj el tio, grafo onklo komprenos pri kia viro temas. Fakte ĉi-viro intencis edzinigi tiun protektatan knabinon: ĉu por forigi ŝin el la mondaj danĝeroj, vi min komprenas, ĉu pro alia kaŭzo, li tute rezolutis edzinigi ŝin; kaj li jam trovis la... la viron: temis pri alia protektato, kiun eble, kaj eĉ sendube senjoro onklo konas laŭnome; ĉar mi taksas certe ke la sekreta Konsilio devis pritrakti tiun indan ulon».

«Kiu li estas?». «Silko-ŝpinisto, Lorenzo Tramaglino, tiu kiu...». «Lorenzo Tramaglino!» elkriis grafo onklo. Ja bone! ja brave, patro! Certe... fakte..., li havis leteron por iu... Domaĝe ke... Sed ne gravas; bone. Kaj kial senjoro Don Rodrigo nenion al mi diras pri ĉio tio? Kial do li lasas la aferojn tiom progresi, kaj ne sin turnas al la homo, kiu povas kaj volas lin gvidi kaj subteni?». «Mi diros la veron ankaŭ pri ĉi tio» daŭrigis Attilio. «Unuflanke, sciante kiom da konfliktoj, kiom da aferoj havas enkape senjoro onklo» (ĉi-lastata, blovante, metis la manon sur sia kapo, por signifi kia granda peno bezonatas por enteni ĉiujn) «sentis kiel skrupulon havigi al vi pluan kverelon. Kaj krome, ĉion mi diros: el tio, kion mi sukcesis kompreni, li estas tiom agacita, tiom furioza, tiom satega pro la ofendaĉoj de tiu frato, ke li pli emas havigi al si senprocesan justecon, ol ricevi ĝin en regula maniero, el la prudento kaj la brako de senjoro onklo. Mi klopodis mildigi la aferon; sed, vidante ke ĝi direktiĝas al perforto, mi taksis mia devo averti pri ĉio senjoron onklon, kiu entute estas kapo kaj

kolono de la domo...».

«Vi estus devinta paroli iom pli frue».

«Estas vere; sed mi esperis ke la afero kvietigōs per si mem, aŭ ke la frataĉo fine reprudentiĝos, aŭ ke li foriros de tiu monakejo, kiel kutime okazas pri tiaj fratoj, kiuj estas jen ĉi tie, jen tie; kaj tiuokaze ĉio finiĝus. Sed...».

«Nun mi mem devos glatigi la aferon».

«Ankaŭ mi mem pensis ĉi tion. Mi diris al mi mem: senjoro onklo, per sia sagaco, per sia aŭtoritato, ja kapablos preventi la skandalon, kaj samtempe savi la honoron de Don Rodrigo, kiu entute estas ankaŭ honoro lia. Tiu ĉi monako, mi diris, daŭre mencias la ŝnurzonon de sankta Francisko; sed por trafe ĝin uzi, li ne devus teni ĝin ĉirkaŭ-ventre. Senjoro onklo havas cent rimedojn, kiujn mi ne konas: mi scias, ke la patro provincialo konsideregas lin laŭkonvene; kaj se senjoro onklo taksas ĉi-kaze plej bona rimedo transloĝigi la kapucenon, li, per du vortoj...».

«Via moŝto lasu la zorgon al tiu, kiu devas», diris iom krude grafo onklo.

«Ha, tio veras!» elkriis Attilio, balancetante la kapon, kaj ridaĉante sin-kompate. «Ĉu estus mi la viro taŭga por doni konsilojn al senjoro onklo! Sed ja la pasio por la reputacio de nia gento instigas min paroli. Kaj mi timas, ke mi faris alian malbonaĵon», li aldonis kun pensema mieno: «mi timas ke mi faris maljustaĵon al Rodrigo en la konsidero de senjoro onklo. Mi ne paciĝus kun mi mem, se mia elpaŝo vin pensigus, ke Rodrigo ne havas la tutan fidon en vi, la tutan laŭdevan subiĝemon. KREDU, senjoro onklo, ke ĉi-kaze estas ĝuste...».

«Nu, nu; kia maljustaĵo, kia maljustaĵo inter vi ambaŭ? Vi ĉiam estos reciproke amikoj, ĝis unu fariĝos prudenta. Vi

pendumindaj, pendumindaj, daŭre farantaj misfarojn; kaj mi mem devas ilin ripari: vi kiuj... igas min diri frenezaĵon: vi ambaŭ kaŭzas al mi pli da zorgo ol», kaj ĉe tio imagu kian blovon li eligis, «ol tiuj benataj ŝtataferoj».

Attilio esprimis ankoraŭ kelke da senkulpigoj, da promesoj, da komplimentoj; poste li adiaŭis kaj foriris, akompanate de «kaj ni prudentu», kio estis la adiaŭa formulo de grafo onklo por liaj nevoj.

XIX

La homo, kiu eventuale vidas en miskultivata kampo herbaĉon, ekzemple belan paciencon, kaj volas ekscii precize, ĉu ĝi devenas el semo maturiĝinta tiu-kampe, aŭ alportita de vento, aŭ ĉu ĝin faligis birdo, tiu neniam atingos certan konkludon, malgraŭ ĉia cerbumo. Tiel same, ankaŭ ni mem ne povas diri, ĉu la decido eluzi la patron provincialon, por plej taŭge tranĉi tiun implikitan nodon, venis al grafo onklo el la natura bazo de lia cerbo, aŭ el la sugesteto de Attilio. Nur certas, ke Attilio ne hazarde diris tiun vorteton; kaj kvankam estis atendeble, ke al tiel malkaŝa sugesto la ofendiĝema vantemo de l' grafo onklo reagos, tamen li decidis aperigi al li la ideon pri tia elturniĝo, kaj direkti lin sur la vojon, tra kiu li deziris irigi lin. Aliflanke, tia elturniĝo tiele kongruis kun la temperamento de l' grafo onklo, kaj tiom taŭgis por la cirkonstancoj, ke estas vetinde, ke per si mem li ĝin eltrovus, sen ies ajn sugesto. Nepris ke lia nevo, homo kun lia familinomo, ne malvenku en bedaŭrinde malkaŝa milito: afero tute esenca por la reputacio pri potenco, kiu tiom zorgigis lin. Eventuala elpaŝo de la nevo mem, por eldevigi riparon, estus rimedo pli aĉa ol la malbono, kaj semo de malfeliĉoj; nepris do ĝin malebligi ĉiumaniere kaj senprokraste. Ĉu ordoni, ke li forlasu en tiu momento sian vilaon; li certe ne obeus; kaj eĉ se jes, tio signifus cedi batalkampon: retreto de la nobeldomo fronte al la monakejo. Ordonoj kaj legĉ-forto estis timigiloj ne efikaj kontraŭ tiuspeca kontraŭulo: la ordena kaj dioceza pastraroj estis tute imunaj el ĉia laika jurisdikcio; kaj ne nur la personoj, sed ankaŭ iliaj loĝejoj; ĉi tion scii devus eĉ la homo leginta nur ĉi tiun historion (li estus kompatinda). La nura afero farebla kontraŭ tia kontraŭulo, estis la klopodo forsendi

lin, kaj rimedo por tio povis esti nur la patro provincialo, el kies arbitro dependis ties foriro aŭ restado.

Nu, inter la provincialo kaj la grafo onklo estis malnova interkono: ili intervidiĝis nur malofte, sed ĉiufoje kun granda elmonro de amikeco, kaj senmezura propono de komplezoj. Kaj foje preferindas rilati nur kun unu homo estanta super multe da unuopuloj, ol kun unu el ĉi-lastaj, vidanta nur sian aferon, sentanta nur sian pasion, zorganta nur sian starpunkton, dum la alia vidas samtempe cent rilatojn, cent sekvaĵojn, cent interesojn, cent evitindajn kaj cent gardindajn aferojn; kaj do oni povas aliri lin el cent flankoj.

Ĉion atente konsiderinte, la grafo onklo iun tagon invitis la patron provincialon, kaj al li havigis kronon da tablanoj elektitaj kun plej fajna sagaco. Iuj parencoj el plej alt-titolaj, el tiuj kies nura familia nomo estis granda titolo; kaj kiuj, nur per sia teniĝo, per kunnaskita sekureco, per senjoreca senĝeneco, parolante pri grandaj aferoj per familiaraj terminoj, sukcesis, eĉ senintence, stampi kaj ĉiumomente memorigi la impreson pri supereco kaj potenco; kaj iuj klientoj ligitaj al la domo per hereda dependeco, kaj al lia persono per dumviva servado; kiuj, komencante ek de la unuaplada supo respondi jese, per la buŝo, per la okuloj, per la oreloj, per la tuta kapo, per la tuta korpo, per la tuta animo, ĝis la fruktoj, reduktiĝis al tio, ke oni forgesis, kiel oni neas.

Ĉe-table la grafo mastro baldaŭ temigis la konversacion pri Madrido. Al Romo, laŭproverbe, oni iras tra pluraj vojoj; al Madrido li iradis tra ĉiaj. Li parolis pri la kortego, pri la grafo duko, pri la ministroj, pri la familio de la guberniestro, pri la taŭro-bataloj, kiujn li povus tute priskribi, ĉar li ĝuis ilin el speciala loko; pri Eskorialo, pri kiu li povus raporti tute

detale, ĉar favorato de la grafo duko kondukis lin tra ĉiuj ties anguletoj. Dum kelke da tempo la tuta societo, kvazaŭ aŭskultantaro, priatentis nur lin, poste ĝi disiĝis je diversaj apartaj interparoloj; kaj tiam li daŭrigis rakonti aliajn el tiuj belaj aferoj, kvazaŭ konfidence, al la patro provincialo, kiu sidis liaflanke, kaj kiu lasis lin diradi, diradi kaj diradi. Sed iumomente li deturnis iomete la parol-temon el Madrido, kaj de kortego al kortego, de alt-rango al alt-rango, lia parolo temis pri kardinalo Barberini, kiu estis kapuceno, kaj frato de la tiam reganta papo, Urbano la 8-a: imagu. Ĉe tio eĉ la grafo onklo devis iomete lasi paroli, kaj aŭskulti silente, kaj memori, ke, entute, en ĉi-mondo ne ekzistas nur la eminentuloj gravaj por li. Nelonge post leviĝo el la tablo, li petis la patron provincialon transiri kun li en alian ĉambron.

Du potencoj, du blankaj hararoj, du rafinitaj spertoj troviĝis vizaĝ-al-vizaĝe. La noblega senjoro sidigis la tre respektindan patron, poste ankaŭ li mem sidigis sin, kaj komencis: «konsidere nian faktan reciprokan amikecon, mi taksis oportune paroli al via patra moŝto pri afero, kiu interesas nin komune, afero, kiun ni konkludu inter ni, evitante aliajn vojojn, kiuj povus... Kaj tial, sencere monie, tute elkore, mi al vi diros, pri kio do temas; kaj mi certas, ke per du vortoj ni akordiĝos. Diru: ĉu en via kapucenejo de Pescarenico loĝas iu patro Cristoforo el ***?»

La provincialo kap-jesis.

«Bonvolu via patra moŝto al mi diri tute klare, kiel bona amiko... tiu ĉi subjekto... tiu ĉi patro... mi persone ne konas lin; malgraŭ tio ke da kapucenoj mi konas plurnombre: oraj homoj, fervoraj, prudentaj, humilaj: mi amikas al la kapucena ordeno ek de mia infan-aĝo... sed en ĉiuj plurmembraj

familioj... ĉiam estas ia ulo, ia cerbo... Kaj pri tiu ĉi patro Cristoforo, mi scias el certaj raportoj, ke li estas viro... kiu ŝatetas kontraŭstarojn... ke li ne havas la tutan laŭdevan singardemon, ĉiujn laŭdevajn konsiderojn... Mi vetus ke pli ol unufoje li kaŭzis zorgojn al via patra moŝto».

– Mi komprenis: temas pri puntilio, – pensis intertempe la provincialo: – mi mem kulpas; mi ja sciis, ke tiu benata Cristoforo estas homo por irigi de predikejo al predikejo, kaj ne restigi lin ses monatojn en unu sama loko, ĉefe en kamparaj kapucenejoj. –

«Ho!» li diris poste: «mi vere bedaŭras, aŭdante ke via eminentega moŝto tian koncepton havas pri patro Cristoforo; dum, laŭ mia scio, li estas monako... modela en la monakejo, kaj altestimata ankaŭ ekster ĝi».

«Mi tute komprenas; via patra moŝto devas... Tamen, tamen, kiel sincera amiko, mi volas vin averti pri afero, kies kono al vi utilos; kaj eĉ se vi jam estus informita pri ĝi, mi povas, ne perfidante miajn devojn, vin atentigi pri eblaj... sekvaĵoj: pli multe mi ne diras. Pri tiu ĉi patro Cristoforo, ni scias, ke li protektis viron tiean, viron... via patra moŝto verŝajne aŭdis pri li; homo kiu, kun granda skandalo, eskapis el la justico, farinte, en tiu terura sankt-Marteno-tago farojn... farojn... Lorenzo Tramaglino!». – Aj! – pensis la provincialo; kaj li diris: «Tiu ĉi cirkonstanco estas por mi novaĵo; sed via eminentega moŝto ja scias, ke apartenas ĝuste al nia ofico serĉi erarintojn, por ilin rekonduki...».

«Bone; sed protekto al iuspecaj erarintoj...! Temas pri dornaj aferoj, pri delikataj aferoj...». Kaj ĉe tio, anstataŭ pufigi la vangojn kaj blovi, li kunpremis la lipojn, kaj suĉis tiom da aero, kiom li kutimis eligi blovante. Kaj li daŭrigis: «mi taksis

konvene aludeti al vi ĉi tiun cirkonstancon, ĉar, se eventuale lia guberniestra moŝto... Oni povus fari elpaŝon en Romo... mi scias nenion... kaj el Romo povus al vi veni...».

«Mi estas ege ŝulda al via eminentega moŝto pro tiu ĉi averto; tamen mi certas ke, se oni kolektos informojn ĉi-koncerne, oni trovos ke patro Cristoforo rilatis kun la viro de vi menciita nur kun la celo konduki lin al prudento. Patron Cristoforo mi ja konas».

«Vi ja scias pli bone ol mi, kia ulo li estis en la mondumo, la aferetojn, kiujn li faris dum sia junaĝo».

«Estas ja gloro de la monaka robo, sinjoro grafo, ke viro, kiu en la mondumo estigis bruon pri si mem, survestinte ĝin, fariĝas alia homo. Kaj ek de kiam patro Cristoforo surportas tiun robon...».

«Mi volus tion kredi: mi ĝin diras elkore: mi volus tion kredi; sed foje, kiel diras proverbo: por monakon fari, ne sufiĉas kapuĉo».

La proverbo verdire ne estis tute trafa; sed la grafo rapide eldiris ĝin anstataŭ alia, spontane veninta sur lian langon: lupo ŝanĝas harojn, sed ne misfarojn.

«Mi havas indicojn», li daŭrigis, «mi havas pruvojn...».

«Se vi pozitive scias», diris la provincialo, «ke tiu ĉi religiulo faris misaĵon (ĉiu ajn povas erari), mi taksos vera komplezo ricevi informon pri ĝi. Mi estas superulo: ja malinde; sed mi estas tio ĝuste por korekti, por ripari».

«Mi diros al vi: aldone al tiu bedaŭrinda cirkonstanco de l' malkaŝa protekto de tiu patro por la persono, kiun mi al vi diris, estas alia malagrabra afero, kiu povus... Sed, inter ni, ni ĉion glatigos per unu fojo. Temas pri jeno, ke tiu sama patro Cristoforo ekkoliziis kun mia nevo, Don Rodrigo ***».

«Ho! tion mi bedaŭras, mi bedaŭras, vere mi bedaŭras».

«Mia nevo estas juna, vigla, li konscias sian rangon, li ne kutimas ricevi provokojn...».

«Estos mia devo kolekti laŭdevajn informojn pri tia okazintaĵo. Kiel mi jam diris al via eminentega moŝto, kaj mi parolas kun senjoro eminenta pro justeco ne malpli ol pro sperto pri la mondo, ni ĉiuj estas el karno, erari-povaj... ĉu el unu flanko, ĉu el la alia: kaj se evidentiĝos ke patro Cristoforo misis...».

«Vidu, patra moŝto; temas pri aferoj, kiel mi jam diris, kiujn oni finu inter ni, oni subterigu ĉi tie, aferoj kiuj, se tro multe ilin traktaĉi... efikas eĉ pli aĉe. Vi ja scias, kio do postsekvos: tiaj ĉi kolizioj, tiaj ĉi puntilioj foje komenciĝas el bagatelo, kaj ili plu iras, plu iras... Se strebi trovi ties finon, aŭ oni ne sukcesas, aŭ aperas cent aliaj implikoj. Kvietigi, tranĉi, tre respektinda patro: tranĉi, kvietigi. Mia nevo estas juna; la monako, laŭ tio, kion mi aŭdas, ankoraŭ havas la tutan spiriton, la... inklinojn de junulo; apartenas al ni, kiuj estas multjaraj... bedaŭrinde, ĉu ne, tre respektinda patro?...».

Se ĉeestus eventuala spektanto, tiu eldiro lin impresus kiel se, dum ludado de serioza opero,¹ la kurteno erare leviĝas antaŭtempe, kaj aperas kantisto, kiu, tute ne pensante ke ekzistas publiko en la mondo, sencere monie konversacias kun kompano. La vizaĝo, la sinteno, la voĉo de grafo onklo, dum li eldiris tiun *bedaŭrinde*, ĉio estis natura: tie tute forestis diplomateco: lin vere ĉagrenis lia maljuneco. Ne ĉar li bedaŭrus la amuzojn, la vervon, la gracion de junaĝo: frivolaĵoj, bagatelaĵoj, mizeraĵoj! La kaŭzo de lia ĉagreno ja estis pli serioza kaj grava: temis pri tio, ke li esperis iun pli

¹ *opero*: muzika teatraĵo.

altan postenon, kiam tiu vakos; kaj li timis, ke li ne havos tempon, por ĝin atingi. Oni rajtis certi ke, post ties atingo, li ne plu bedaŭros siajn multajn jarojn, nenion alian li deziras, kaj li mortos kontenta, kiel ĉiuj ege sopirantaj iun celon certigas ke ili faros post ties atingo.

Sed, por raporti lian parolon, «apartenas al ni», li daŭrigis, «prudenti por la junuloj, kaj ripari iliajn misfarojn. Bonŝance ne estas tro malfrue; la afero ne faris bruon; en nia kazo ankoraŭ validas la saĝa maksimumo *principiis obsta*². Forigi la fajron disde la pajlo. Foje ulo, kiu iuloke ne bone faras, aŭ povus estigi malkonvenaĵon, mirinde konvenas aliloke. Via patra moŝto ja scipovos trovi konvenan niĉon por tiu religiulo. Aldoniĝas ankaŭ la alia cirkonstanco³: ke eble li falis en suspekton de iu..., kiu povus deziri lian delokigon; kaj transloĝigante lin iom foren, ni atingas du avantaĝojn per unu elpaŝo: ĉio ĝustiĝas per si mem, aŭ pli bone, nenio estas fuŝita.

Tiun ĉi konkludon la patro provincialo atendis jam dekomence de la interparolo. – Jes ja! – li pensis en si mem: – mi vidas, kien do vi celas: kiel kutime; kiam povran fraton malŝatas vi, aŭ unu el vi, aŭ li vin ombros, tuj, ne esplorante, ĉu li pravas aŭ malpravas, la superulo devas forigi lin. –

Kiam la grafo finis, kaj eligis longan blovon, kiu signifis finan punkton, «mi tute komprenas», diris la provincialo, «tion kion sinjoro grafo intencas diri; sed antaŭ ol fari elpaŝon...».

«Ĝi estas elpaŝo kaj ne elpaŝo, tre respektinda patro: ĝi estas tute natura, tute ordinara afero; kaj se oni ne alprenas tiun ĉi rimedon, kaj senprokraste, mi prognozas amason da malordoj, Iliadon da malfeliĉoj. Mi ne opinias, ke mia nevo...

² *principiis obsta* = komencon kontraŭstaru: latina slogano.

³ *la alia cirkonstanco*: la protekto al la «krima» Renzo.

faros misfaron... por tion eviti, ĉeestas mi... Sed la problemo atingis tian gradon, ke, se ni mem ne tranĉas ĝin senprokraste, per abrupta bato, ne eblas, ke ĝi ĉesos per si mem, nek ke ĝi restos sekreta... kaj tiam ne plu temos nur pri mia nevo... Oni incitas vesparon, tre respektinda patro. Vi vidas; ni estas gento, ni havas ligojn...». «Eminentajn».

«Vi min komprenas: ĉiuj homoj kun nobela sango, kaj kiuj, en ĉi-mondo... ion valoras. Estiĝas puntilio, ĝi fariĝas komuna afero; kaj tiam, eĉ la homo amika de paco... Estus al mi korkreve, se devi, se troviĝi... mi, kiu ĉiam havis grandan inklinon al la patroj kapucenoj...! La patraj moŝtoj, por bonfari, kiel ili fakte bonfaras, kun granda edifo de la popolo, bezonas pacon, malhavi kverelojn, resti en harmonia etoso kun tiu, kiu... Kaj krome, ili havas parencojn en la mondo... kaj tiaj ĉi puntiliaĉoj, se eĉ nur ete pludaŭri, etendiĝas, disbranĉiĝas, kuntrenas... duonan mondon. Mi troviĝas en tiu ĉi benata ofico, kiu min devigas gardi certan honoron... Lia guberniestra moŝto... miaj senjoroj kolegoj... ĉio fariĝas klasa afero... des pli kun tiu alia cirkonstanco... Vi ja scias, kiel iras ĉi tiaj aferoj».

«Verdire», diris la patro provincialo, «patro Cristoforo estas predikisto; kaj mi jam havis ian intencon... Oni je mi petas ĝuste... Sed ĉi-momente, en tiaj ĉi cirkonstancoj, la afero povus aspekti kiel puno; kaj puno, antaŭ tuta klarigo, estus...». «Ne puno, ne: prudenta dispozicio, rimedo por komuna konveno, por malhelpi sinistraĵojn, kiuj povus... mi klarigis».

«Inter via grafa moŝto kaj mi, la afero restas ĉi tiel; mi komprenas. Sed, se la afero statas kiel oni ĝin raportis al via eminentega moŝto, al mi ŝajnas neeble, ke en la vilaĝo tute nenio malkaŝiĝis. Ĉiuloke estas da instigantoj, semantoj de

malkonkordo, aŭ almenaŭ malicaj scivoluloj kiuj, se vidi senjorojn konflikti kun religiuloj, freneze plezuriĝas; kaj ili flaras, interpretas, klaĉas. Ĉiu havas sian honoron por gardi; koncerne min, kiel superulon (malindan), mi havas la specifan devon... la honoro de l' monaka robo... ne estas mia proprieto... ĝi estas deponaĵo, pri kiu... Via sinjoro nevo, estante tiel ekscitita, kiel via eminentega moŝto diras, povus konsideri la aferon kiel riparon al li faritan, kaj li povus... mi ne diras fanfaroni, triumfi, sed...».

«Ĉu tio al vi ŝajnas, tre respektinda patro? Mia nevo estas kavaliro, kiu en la mondo estas konsiderata... laŭ sia rango kaj laŭdeve; sed antaŭ mi, li estas knabo; kaj li faros nek pli nek malpli ol tio, kion mi mem al li preskribos. Krom tio, mi eĉ aldonas, ke mia nevo nenion ekscios pri tio. Kial ni bezonus doni konton? Temas pri aferoj, kiujn ni solvas inter ni, kiel bonaj amikoj; kaj inter ni ili restu. Ne zorgu pro tio. Mi ja devas kutimi silenti». Kaj li blovis. «Rilate la klaĉulojn», li daŭrigis, «kion vi opinias, ke ili diros? Monako, kiu iras prediki en alia loko, estas tute ordinara afero! Kaj krom tio, ni kiuj vidas... ni kiuj antaŭvidas... ni kiuj havas devon... ni entute ne devas zorgi pri klaĉoj».

«Tamen, por ilin preventi, konvenas ke en tiu ĉi okazo via sinjoro nevo faru ian elmontron, donu malkaŝan signon de amikeco, de konsidero... ne por ni, sed por la monaka robo...».

«Certe, certe; tio ĉi estas prava... Sed ĝi ne estas necesa: mi scias ke la kapucenojn mia nevo ĉiam akceptas laŭdeve. Laŭinkline li tion faras: ĝi estas familia emo: kaj krome, li scias ke per tio li faras agon de mi ŝatatan. Cetere, ĉi-kaze... io eksterordinara... tro pravas. Lasu ke mi mem tion zorgu, tre respektinda patro; kaj mi ordonos al mia nevo... Tio estas: oni

devos al li sugesteti prudente, por ke li ne konsciiĝu, kio do okazis inter ni. Ĉar mi ne volus ke ni surmetu kataplasmon⁴ tie, kie ne estas vundo. Kaj rilate nian interkonsentitan decidon, ju pli frue plenumite, des pli bone. Kaj se troviĝus niĉo iom fora... por tute forigi ĉian okazigon...».

«Oni de mi petas ĝuste predikiston el Rimini; kaj eble, eĉ sen alia kialo, mi estus konsiderinta...».

«Tre oportune, tre oportune. Kaj kiam?».

«Ĉar la aferon oni devas fari, oni faros baldaŭ».

«Baldaŭ, baldaŭ, tre respektinda patro: pli bone hodiaŭ ol morgaŭ. Kaj», li daŭrigis, leviĝante elside, «se aŭ mi mem, aŭ mia familio, ion povas por niaj bonaj patroj kapucenoj...».

«Ni sperte konas la korfavoron de via gento», diris la patro provincialo, kaj ankaŭ li mem leviĝis, kaj ekiris al la pordo, malantaŭ lia venkinto.

«Ni estingis fajron», diris ĉi-lasto, haltetante, «fajron, tre respektinda patro, kiu povus flamigi grandan fajregon. Inter intimaj amikoj oni per du vortetoj grandajn aferojn ĝustigas».

Atinginte la pordon, li malfermegis ĝin, kaj tute volis ke la patro provincialo antaŭiru: ili eniris en la alian ĉambron, kaj rekuniĝis kun la cetera societo.

Tiu senjoro ĝenerale aplikis grandan zorgon, grandan majstrecon, grandajn vortojn en intertraktoj; kaj poste li gajnis kongruajn fruktojn. Fakte, per la interparolo, de ni raportita, li sukcesis piedmarŝigi patron Cristoforo de Pescarenico ĝis Rimini, kio estas rimarkinda promeno.

Iun vesperon alvenas al Pescarenico kapuceno el Milano

⁴ *kataplasmo*: densa kaĉo, kiun oni aplikis sur parton de la korpo, kiel kuracilon de inflamoj.

kun koverto por la patro gardanto. En ĝi enestas la postulo de obeo por patro Cristoforo, ke li iru al Rimini, kie li faros la karesmo-predikadon. La letero adresita al la gardanto enhavas la instrukcion komprenigi al la menciita frato, ke li forlasu ĉian prizorgon de aferoj eventuale entreprenitaj en la lando, de kiu li devas foriri, kaj ke tie li gardu nenian korespondadon: la frato portinta la leteron estu lia kunvojaĝonto. Tiun vesperon la gardanto nenion diras; la morgaŭan matenon li venigas fraton Cristoforo, al li montras la obeo-postulon, al li ordonas iri preni la man-korbon, la bastonon, la ŝvitotukon kaj la zonon, kaj, kune kun tiu kunfrato, kiun li al li prezentas, tuj ekvojaĝi.

Ĉu tio estis bato por nia frato, imagu vi mem. Renzo, Lucia, Agnese, tuj prem-okupis lian penson; kaj li elkriis, se tiel diri, en si mem: – ho Dio! kion do faros tiuj povruroj, kiam mi ne plu estos ĉi tie! – Sed li levis la okulojn al la ĉielo, kaj kulpigis sin, ke li malfidis, kaj ke li taksis sin necesa por io. Li krucigis la manojn surbruste kiel signon de obeo, kaj li klinis la kapon antaŭ la patro gardanto; kiu apartigis lin, kaj donis al li la alian instrukcion, per parolo konsil-tona, kaj kun senco ordona. Frato Cristoforo iris al sia ĉelo, prenis la man-korbon, en ĝin metis la brevieron, sian karesmo-predikaron, kaj la pardono-panon, li ĉirkaŭligis la robon per sia leda zono, li adiaŭis la kunfratojn, kiuj tiumomente troviĝis en la monakejo, kaj fine li iris preni la benon de la gardanto kaj, kune kun la kompano, li ekiris la vojon al li preskribitan.

Ni jam diris, ke Don Rodrigo, tute obstina plenumi sian belan entreprenon, estis decidinta peti helpon de terura viro. Pri li ni povas diri nek personan nek familian nomon, nek titolon, kaj eĉ ne konjekton pri ĉi-ĉio: afero des pli stranga, ĉar

pri tiu gravulo ni trovas memoron en pluraj tiuepokaj libroj (presitajn librojn mi aludas). La sameco de la agoj forigas ĉian dubon pri la identeco de la homo; sed ĉie estas granda zorgo eviti ties nomon, kvazaŭ ĝi nepre bruligus la skribilon, aŭ eĉ la manon de la skribanto. Francesco Rivola, en la biografio de kardinalo Federigo Borromeo, devante pritrakti tiun viron, nomas lin «senjoro same potenca pro riĉaĵoj kiom nobela pro gento», kaj estas ĉio. Giuseppe Ripamonti, kiu en la kvina libro de la kvina deko de sia *Patruja Historio*, faras pli longan mencion pri li, nomas lin: iu, tiu-ĉi, tiu homo, ĉi-viro, tiu gravulo. «Mi raportos», li diras en sia bela latino, kiun ni tradukas laŭpove, «la kazon de iu, kiu, estante inter la unuarangaj en la urbo, starigis sian loĝ-lokon en kamparo situanta landlime; kaj tie, sekurigante sin per pluraj krimoj, li taksis kiel nulon juĝojn, juĝistojn, ĉian juĝistaron, la suverenecon; li travivis tute sendependan vivon; rifuĝigisto de ekziluloj kaj li mem iama ekzilulo; kaj reveninte pli poste, kvazaŭ nenio estus okazinta...». El tiu ĉi verkisto ni ĉerpos kelke da aliaj fragmentoj, eventuale taŭgaj por konfirmi kaj klarigi la rakonton de nia anonimulo; kun kiu ni pluiras.

Fari tion, kion leĝoj malpermesis aŭ ajna potenco kontraŭis; arbitri, mastri ĉe alies aferoj, sen alia intereso krom la plezuro komandadi; esti timata de ĉiuj, havi prioritaton super tiuj kiuj kutimas havi ĝin super aliaj; jen estis ĉiutempe la ĉefaj pasioj de tiu viro. Ek de sia adolesk-aĝo, ĉe la spektaklo kaj la bruo de tiom da perfortoj, de tiom da konfliktoj, ĉe l' vido de tiom da tiranoj, li sentis miksaĵon el indigno kaj senpacienca envio. Junaĝe, kaj vivante en urbo, li ne evitis, sed eĉ serĉis okazojn, por kvereli kun la plej famaj ĉe tia profesio, ilin alfronti, por konkuri kun ili, por ilin devigi

al cedo, aŭ ilin devigi serĉi lian amikecon. Superante plej grandan parton de ili per riĉaĵoj kaj sekvantaro, kaj eble ĉiujn per aŭdaco kaj obstino, multajn li devigis rezigni ĉian rivalecon, multajn li aranĝacis, multajn li igis amikoj; tute ne samrangaj, sed, kiel li nur ŝatis, amikoj obeemaj, kiuj sin agnoskas pli subaj, kaj staras liamaldekstre. Fakte tamen, ankaŭ li mem fariĝis peranto, instrumento de ĉiuj tiaj homoj: en siaj puntilioj ili ne evitis peti elpaŝon de tia helpanto; laŭ li, retroto signifus defali de sia reputacio, maltrafi sian celon. Li faris tiom da misfaroj, ĉu por si, ĉu por aliaj, ke li devis cedi lokon, kaj ekziliĝi el la ŝtato, pro tio ke, por lin subteni kontraŭ publikaj kondamnoj kaj kontraŭ multe da potenculaj venĝemoj, sufiĉis nek la nomo, nek la paren caro, nek la amikoj, nek lia aŭdaco. Mi opinias, ke ĝuste ĉi tiun cirkonstancon koncernas rimarkinda fakto rakontita de Ripamonti: «Iufoje, kiam tiu viro ekziliĝis de la lando, jen estis la sekreteco, kiun li aplikis, la respekto kaj la timemo estis ĉi tiaj: li trairis la urbon ĉeval-rajde, kun sekvanta hundaro, kaj kun trumpetado; kaj pasante antaŭ la kortega palaco, li lasis al la gardistaro mesaĝon plenan de maldecaĵoj por la guberniestro».

Dum sia foresto, li ne interrompis siajn agadojn, nek evitis korespondojn kun tiaj amikoj restintaj ligitaj kun li, se laŭvorte traduki el Ripamonti, «en sekreta ligo de kruelaj maĥinacioj kaj fatalaj aferoj». Eĉ ŝajnas ke ĝuste tiam li starigis kun pli alt-rangaj homoj terurajn fi-ligojn, pri kiuj la menciita historiisto parolas kun mistera koncizeco. «Ankaŭ eksterlandaj princoj», li diras, «eluzis plurfoje lian aktivadon, por gravaj murdoj, kaj ofte okazis, ke ili al li sendis de malproksime helpo-trupojn serve sub lia komando».

Fine (ne sciante post kiom da tempo), aŭ pro nuligo de la ekzil-ordono, aŭ pro ies potenco propeto, aŭ pro tio ke lia aŭdaco signifis imunecon, li decidis reveni en la patrolandon, kaj revenis fakte; ne tamen al Milano, sed en kastelon landliman kun la Bergama teritorio, kiu estis tiutempe, kiel ĉiu scias, parto de la Venecia ŝtato. «Tiu domo», mi ankoraŭ citas Ripamonti-n, «estis kvazaŭ laborejo de sango-verŝaj komisioj: servistoj, por kies kapo-tranĉo estis fiksita premio, kaj kies metio estis tranĉi alies kapojn: nek kuiristo nek teler-lavisto ne devigita hom-murdi: manoj de knaboj estis sango-plenaj». Krom tiu bela domanaro, li havis, kiel deklaras la sama historiisto, alian araĉon el similaj uloj, dismetitaj kaj postenigitaj kvazaŭ garnizone en pluraj lokoj de ambaŭ ŝtatoj, ĉe kies landlimo li vivis, kaj ĉiam pretaj al liaj ordonoj.

Ĉiuj tiranoj, en vasta ĉirkaŭspaco, iam aŭ tiam devis elekti inter amikeco kaj malamikeco kun tia eksterordinara tirano. Sed al la unuaj, provintaj rezisti, la afero efikis tiel aĉe, ke neniu plu aŭdacis tion provi. Kaj, eĉ prizorgante nur siajn aferojn kaj restante aparte, tute ne eblis resti sendependa de li. Ĉe eventuala alveno de lia mesaĝisto kun la ordonego forlasi entreprenaĵon, aŭ ne plu ĝeni iun ŝuldanton, aŭ simile, nepris respondi jes aŭ ne. Kiam unu partio vasaleske venis konfidi al li ajnan aferon, la alia partio troviĝis en la malfacila elekto, aŭ plenumi lian verdikton, aŭ sin deklari lia malamiko; kio egalvaloris, laŭ iama dirmaniero, al tria-grada ftizo⁵. Multaj, estante malpravaj, venis peti lian helpon, por fariĝi fakte pravaj; multaj venis kvankam pravaj, por akapari tiel fortan protekton, kaj malebligi ke ĝin petu kontraŭulo: unuj kaj aliaj fariĝis pli specife liaj subuloj. Okazis kelkfoje ke al li sin

⁵ *triagrada ftizo* = tuberkulozo je la lasta, mort-proksima, stadio.

turnis senfortulo premata kaj turmentata de supertrudulo; kaj li pledante por la senfortulo, devigis la alian ĉesigi la aferon, ripari la misfaron, pardonpeti; aŭ, se tiu obstinis, li kontraŭ lin batalis, kaj lin devigis forlasi la tiranitajn lokojn, aŭ eĉ suferi pli tujan kaj teruran punon. Kaj tiukaze tiu nomo tiom timata kaj abomenata, estis momente benita: ĉar tio, kion mi ne nomos justeco, sed rimedo, tiu ajna kompenso, estis tiuepoke malhavebla per alia privata aŭ publika forto. Sed pli ofte, kaj eĉ kutime, lia forto estis kaj restis instrumento de malicaj voloj, de kruelaj riparigoj, de orgojlaj kapricoj. Sed tiel diversaj aplikoj de tiu forto ĉiam efikis la samon: stampi en la animojn grandan impreson pri kiom li povas decidi kaj efektiviĝi spite justecon kaj maljustecon: du aferojn⁶, kiuj metas tiom da malhelpoj al la volo de l' homoj, kaj oftege devigas ilin al retreto. La famo de la ordinaraj tiranoj estis plej ofte limigita en la teritorio, kie loĝis la plej riĉaj kaj plej fortaj el ili: ĉiu distrikto havis la siajn; kaj ili estis inter si tiom similaj, ke ne estis kialo, por zorgi pri la aliaj, kiuj ne estis tute apude. Sed la famo pri ĉi-nia jam de longe disvastiĝis en la tuta Milano: ĉie, lia vivo estis temo de popol-rakontoj; lia nomo signifis ion ne-rezisteblan, strangan, fabelan. Ankaŭ la suspekto, ke li havas ĉiuloke siajn liganojn, siajn ekzekutistojn, kontribuis gardi ĉiuloke la memoron pri li. Temis nur pri suspektoj; ĉar, kiu do malkaŝe konfesus tian dependecon? Sed ĉiu tirano povus esti lia ligano, ĉiu kanajlo, unu el liaj anoj; kaj ĝuste la necerteco igis tiun opinion pli vasta, kaj la teruron pli tenebra. Kaj ĉiufoje kiam iuloke aperis

⁶ *du aferojn*: li povis spiti unuflanke justecon, kiu foje malhelpas neaŭdacajn fiulojn, aliflanke maljustecon, kiu ofte rezignigas timemajn bonvirtulojn.

bravuloj nekonataj kaj pli aspektaĉaj ol kutime, ĉe ĉiu abomena misfaro, kies farinton ne tuj eblis indiki aŭ konjekti, oni eldiris, oni murmuris la nomon de tiu, kiun, dank' al tiu benata (por ne diri alion) deteniĝo de niaj aŭtoroj, ni devos nomi la nenomito.

Ne pli ol sep mejloj lia kastelaĉo distancis de la domo de Don Rodrigo: kaj ĉi-lasto, apenaŭ fariĝinte reganto kaj tirano, devis konstati ke, tiel proksime de tia gravulo, ne eblas tirani, krom konfliktante aŭ akordiĝante kun li. Tial li sin subigis al li, kaj fariĝis lia amiko, laŭ la maniero de l' ceteraj, kompreneble; li al tiu faris pli ol unu servo (la manuskripto ne diras pli multe); kaj li ĉiufoje ricevis promesojn de recipokado kaj helpo, kiam ajn bezone. Li tamen tre zorgis kaŝi tiun amikecon, aŭ almenaŭ ne montri kiom strikta kaj kiaspeca ĝi estas. Don Rodrigo ja volis esti tirano, sed ne sovaĝa tirano: tiu profesio estis por li rimedo, ne celo: li intencis libere loĝi enurbe, ĝui la komfortojn, la amuzojn, la honorojn de la civilizacia vivo; tial li devis gardi iujn respektojn, konsideri siajn parencojn, kulturi la amikecon de altranguloj, teni unu manon sur la justicaj pesil-tasoj, por laŭbezone ilin mallevi siapartie, aŭ por ilin malaperigi, aŭ eĉ, eventuale, ilin bati surkapen de homo, kiun oni pli facile povus servi per tio⁷ ol per la armiloj de privata perforto. Nu, la intimeco, aŭ pli ĝuste: la ligo kun tiuspeca viro, malkaŝa malamiko de la publika forto, certe ne lin favorus tiucele, ĉefe ĉe la grafo onklo. Sed laŭmezure ke tiu amikeco ne estis kaŝebla, ĝi povis aspekti kiel neevitebla rilato kun viro, kies malamikeco estus tro danĝera; tiel ke la neceso iel senkulpigis lin; ĉar la homo kiu havas la taskon rimedi, kaj tion ne volas

⁷ *per tio*: per (mis)justico.

aŭ ne kapablas, fine konsentas ke aliaj certagrade siajn problemojn solvas per si mem; kaj eĉ se li ne konsentas malkaŝe, li tamen okulon fermetas.

Iun matenon, Don Rodrigo ekrajdis, kun ĉas-ekipaĵo, kun malgranda eskorto de piedirantaj bravuloj; la Grizulo ĉe la piedingo, kaj kvar aliaj malantaŭe; kaj li sin direktis al la kastelo de l' nenomito.

La kastelo de l' nenomito imponis super streta kaj morna valo, kulmine de altaĵo elstara el kruta mont-pintaro, nedireble ĉu kun ĝi kunigita aŭ de ĝi disigita per amaso da ŝtonegoj kaj krutejoj, kaj labirinto el kavernoj kaj apikaĵoj, kiuj etendiĝas ambaŭ-flanken. Nur la flanko rigardanta al la valo estas irebla; deklivo iom kruta, sed sufiĉe glata kaj kontinua; kun herbejoj supre, kaj kampoj kaj disaj dometoj ĉe la pli suba deklivo. La fundo estas fluejo el dikaj ŝtonetoj, de roĵo aŭ torentaĉo, laŭ la sezono: tiam ĝi markis la land-limon inter la du ŝtatoj¹. Ankaŭ la kontraŭaj altaĵoj, kiuj konsistigas la alian val-flankon, havas deklivojn parte kultivatajn; la resto konsistas el splitoj kaj ŝtonegoj, apikaj krutaĵoj senvojaj kaj nudaj, escepte de kelke da veproj en la fendoj kaj sur la randoj.

De sur tiu kastelaĉo, kiel aglo el sia sanga nesto, la sovaĝa senjoro regis la tutan ĉirkaŭspacon treteblan per homa piedo, kaj neniun iam li vidis sur si, nek pli supere. Turnante la rigardon ĉirkaŭen, li esploris tiun tutan ĉirkaŭbaraĵon, la deklivojn, la fundon, kaj la vojojn tie sulkitajn. La pado, kiu tra kubut-kurboj kaj ĝirejoj alsupris al la terura loĝejo, etendiĝis antaŭ la okulo de l' desupra rigardanto, kiel serpentuma rubando: el la fenestroj, el la embrazuroj, la senjoro povus tute trankvile kalkuli la paŝojn de eventuala venanto, kaj centfoje lin paf-celi. Kaj eĉ el eventuala granda taĉmento, li povus per sia garnizono de bravuloj algrundigi sur-paden aŭ fal-ruli funden plurajn, antaŭ ol unu el ili sukcesus atingi la kulminon. Cetere neniun, ne ŝatate de l' kastelestro, eĉ nur preterpase aŭdacis enpaŝi la valon, des malpli tien supren. Aliflanke la ĝendarmon, kiu tie sin

¹ *la du ŝtatoj*: Milana teritorio kaj Venecia respubliko.

montrus, oni traktus kiel spionon surprizitan en malamika tendaro. Oni rakontis tragikajn historiojn pri la lastaj provintaj tiaĵoj; sed temis pri jam antikvaj historioj; kaj neniu el la junuloj memoris, ke li vidis en la valo tian invadanton, nek vivan, nek malvivan.

Tian ĉi priskribon la anonimulo faras pri la loko: pri ties nomo, nenio; por malhavigi al ni spurojn por ties malkovro, li eĉ nenion diras pri la vojaĝo de Don Rodrigo, kaj li tuj prezentas lin meze de la valo, komence de l' kruta kaj serpentuma pado supren. Tie staris taverno, kiu povus ankaŭ nomiĝi gardistejo. Sur malnova ŝildo, pendanta super la pordo, estis ambaŭflanke pentrita radianta suno; sed la publika onidiro, kiu foje ripetas la nomojn laŭ ricevita instruo, alifoje ŝanĝas ilin laŭplaĉe, nomis tiun taverson ne alie ol Misnokto.

Ĉe l' bruo de alvenanta rajd-besto, aperis ĉe-sojle knabaĉo, armita kiel Saraceno²; kaj rigardinte, li eniris por informi tri sbiraĉojn ludantajn per malpuraj tegolforme kurbaj ludkartoj. Tiu, kiu aspektis kiel estro, leviĝis, elkliniĝis ĉe l' pordo, kaj, rekoninte amikon de l' mastro, lin salutis respekto-plene. Don Rodrigo, reciprokinte kun granda bontono la saluton, demandis, ĉu la mastro troviĝas en la kastelo; kaj ricevinte de l' ĉefbravulaĉo respondon, ke li kredas ke jes, li deĉevaliĝis kaj ĵetis la bridon al la Sendeviulo, unu el lia sekvantaro. Li demetis sian pafilon kaj ĝin liveris al la Montarano, kvazaŭ por sin liberigi el senutila pezaĵo kaj supreniri pli rapide; sed fakte ĉar li ja sciis, ke tra tiu krutaĵo ne estas permesate iri kun pafilo. Poste li elpoŝigis kelke da *berlinga*-moneroj, kaj donis ilin al la Kaŝejulo, al li dirante: «vi atendu ĉi tie; kaj dume vi povos iom amuziĝi kun ĉi-bravaj

² *Saraceno*: islamana militisto.

homoj». Fine li elpoŝigis kelke da oraj eskudoj, kaj enmanigis ilin al la ĉefbravulaĉo, destinante duonon al li kaj duonon por dividi inter liaj anoj. Fine, kune kun la Grizulo, ankaŭ li mem demetinta sian pafilon, li komencis supreniri piede. Dume la tri menciitaj bravuloj, kaj la Renversulo, kiu estis la kvara (ho! vidu kiaj belaj nomoj, gardindaj tiom zorge), restis kun la triopo de l' nenomito, kaj kun tiu knabo edukita por pendumilo, ludante, drinkante, kaj reciproke rakontante siajn prodaĵojn.

Post nemulte, alia bravulaĉo de l' nenomito, alsuprante, atingis Don Rodrigon; li rigardis lin, rekonis lin, kaj kuniĝis kun li; kaj per tio li indulgis al li la ĝenon eldiri sian nomon kaj plu doni konton al ĉiuj eventualaj renkontotaj ne-konantoj. Atinginte la kastelon, li estis enkondukita (lasante tamen la Grizulon ĉe la pordo) tra zigzago de malhelaj koridoroj, tra diversaj salonoj tapetitaj per muskedoj, sabroj, halebardegoj³; kaj en ĉiu el ili gardostaris kelke da bravuloj; kaj post iom da atendo, li estis allasita en tiun, kie troviĝis la nenomito.

Ĉi-lastata iris al li renkonte, resalutis lin, kaj samtempe rigardis ties manojn kaj vizaĝon, kiel li faris kutime, kaj jam preskaŭ senintence, kun ĉia venanto, eĉ se temus pri plej malnovaj kaj pruvitaj amikoj. Li estis alta, bruna, kalva; blankis la malmultaj restantaj kapharoj; faltojn havis la vizaĝo: unuavide, oni lin taksus pli aĝa ol liaj faktaj sesdek jaroj; sed la sinteno, la movoj, la akraj trajtoj, la sinistra sed viva fajrerado de l' okuloj, indikis korpan kaj animan energiojn eksterordinaraj eĉ ĉe junulo.

Don Rodrigo diris, ke li venas por konsilo kaj helpo; ke troviĝante ĉe malfacila puntilio, el kiu lia honoro lin

³ *muskedoj, sabroj, halebardegoj*: diversaspecaj bataliloj.

malpermesas retreti, li memoris pri la promesoj de tiu viro, kiu neniam promesas tro multe, nek vane; kaj li komencis rakontisian fian implikon. La nenomito, kiu pri tio jam sciis ion, sed konfuze, aŭskultis atente, ĉu pro scivolo pri tiaj historioj, ĉu ĉar estis en ĝi enmiksita nomo de li konata kaj ege abomenata: tio estas frato Cristoforo, malkaŝa malamiko de l' tiranoj ĉu parole, ĉu fare, se tio eblus. Don Rodrigo, konsciante, kun kiu li parolas, strebis troigi la malfacilojn de tiu entrepreno; la distancon de la loko, la monakinejon, la senjorinon!... Ĉe tio la nenomito, kvazaŭ laŭ komando de demono kaŝita en lia koro, interrompis subite, dirante ke la entreprenon li surprenas. Li notis la nomon de nia povra Lucia, kaj forsalutis Don Rodrigon, dirante: «Post nemulte vi ricevos de mi avizon pri tio, kion vi devos fari».

Se la leganto memoras pri tiu fia Egidio loĝanta apud la monakinejo, kie la povra Lucia estis rifuĝinta, li sciu nun, ke tia ulo estis unu el plej intimaj kolegoj de fi-agoj de la nenomito: tial ĉi-lastata eligis tiel baldaŭ kaj rezolute sian promeson. Sed tuj kiam li restis sola, li sentis sin, mi ne diros pentinta, sed kolera, ke li eldiris ĝin. Jam de longete li komencis senti, se ne rimorson, ian malŝaton pri siaj krimaĵoj. La multaj fiaĵoj amasigite, se ne en lia konscienco, en lia memoro, revekiĝis ĉiufoje kiam li faris pluan, kaj ili sin prezentis al lia animo aĉaj kaj tromultaj: estis kiel daŭra kresko de jam ĝena pezaĵo. Ia naŭzo, sentite ĉe l' unuaj krimoj, kaj poste sufokite kaj preskaŭ tute malaperinte, nun sentiĝis denove. Sed en tiuj unuaj tempoj, la imago pri longa, nedefinita estonteco, la sento pri fortika vivemo, plenigis lian animon per senzorga fidemo: nuntempe, male, ĝuste la pensoj pri l' estonteco igis pli ĝena la pasintecon. – Maljuniĝi! morti!

kaj kio poste? – Kaj, rimarkinde! la imago pri la morto, kiu, ĉe proksima danĝero, fronte al malamiko, kutime duobligis la aŭdacon de tiu viro, kaj al li havigis temeraran koleron, tiu sama imago, al li aperante en la nokta silento, en la sekureco de lia kastelo, en lin enmetis subitan konsternon. Ne temis pri la morto, kiun minacas kontraŭulo ankaŭ li mem mortonta; ne eblis ĝin forpuŝi per pli bonkvalitaj armiloj kaj pli rapida brako; ĝi venis sola, naskiĝis deinterne; eble ĝi estis ankoraŭ fora, sed ĝi faris ĉiumomente pluan paŝon; kaj eĉ dum la menso pene batalis por forigi ties penson, ĝi tamen pli kaj pli proksimiĝis. En l' unuaj tempoj la tiel oftaj ekzemploj, la daŭra spektaklo, se tiel diri, de perforto, de venĝo, de murdo, inspirante al li ferocan rivalecon, rolis ankaŭ kiel speco de aŭtoritato por silentigi lian konsciencon: sed nun renaskiĝis de temp' al tempo en lia animo la konfuza, sed terura ideo pri individua juĝo, pri konto donenda, sendepende de alies ekzemplo; nuntempe, tio ke li distingiĝis el la vulgara amaso de l' malbonfaruloj, tio ke li eminentis super ĉiuj, foje havigis al li senton de terura izoleco. Tiu Dio, pri kiu li iam aŭdis, sed kiun li delonge zorgis nek malkredi nek agnoski, nur zorgante vivi kvazaŭ Dio tute ne ekzistus, nuntempe, en momentoj de senkaŭza deprimiĝo, de sendanĝera timo, al li ŝajnis ke li krias deinterne: tamen Mi estas! Ĉe l' unua ardo de l' pasioj, la leĝo, kiu iel estis al li anoncita en la nomo de Dio, al li ŝajnis nur abomeninda: nun, kiam tiu sama Dia leĝo subite al li revenis en la menson, lia menso kontraŭvole konceptis ĝin kiel ion, kio certe efektiviĝos. Sed ne nur li konfidis al neniu tiun ĉi novan malkvieton: li eĉ kovris ĝin profunde, kaj maskis ĝin per elmontro de pli akra kruelo; kaj per tio li klopodis kaŝi ĝin ankaŭ al si mem, aŭ sufoki ĝin. Enviante (ĉar li ne povis ilin

nuligi nek forgesi) la tempojn, kiam li kutimis fari krimojn senrimorse, nur zorgante por ilia plenumo, li faris ĉian klopodon por tiajn tempojn revenigi, por reteni aŭ rekapti la tiaman rezolutan, fieregan, senŝancelan volon, por konvinki sin mem, ke li estas ankoraŭ la sama.

Tial li tiuokaze tuj donis sian vorton al Don Rodrigo: por forigi ĉian heziton. Sed tuj post lia foriro, li sentis malpliigi la firmecon, kiun li al si trudis por promesi, kaj sentis iom post iom en la menso pensojn, kiuj lin tentis rompi tiun vorton, kaj kiuj lin kondukos al neniigo fronte al amiko, al duaranga komplico; tial, por ĉesigi unubate tiun ĝenan konflikton, li vokis la Milvon, unu el la plej lertaj kaj aŭdacaj plenumantoj de liaj kanajlaĵoj, kiun li kutime uzis por korespondi kun Egidio. Kaj kun rezoluta sinteno li al li ordonis surĉevaligi kaj tuj rajdi al Monza, informi Egidion pri la donita vorto, kaj peti lian helpon por ties plenumo.

La fia sendito revenis pli frue ol atendite, kun la respondo de Egidio: ke la tasko estas facila kaj sekura; ke li tuj sendu al li kaleŝon kun du aŭ tri taŭge kamuflitaj bravuloj; kaj li mem zorgos pri la cetero, kaj gvidos la aferon. Ĉe tiu ĉi anonco, la nenomito, kiel ajn li stasis interne, tuj ordonis al la Milvo ĉion disponigi laŭ la diroj de Egidio, kaj veturi al la ekspedicio kune kun du aliaj, kiujn li nomis.

Se, por plenumi tiun hororan servon, Egidio devus kalkuli nur je siaj ordinaraj rimedoj, certe ne tiel baldaŭ li donus tiel rezolutan promeson. Sed ĝuste en tiu azilo, kie ŝajnis ke ĉio tute malhelpas, la kruelega junulo havis rimedon, kiun nur li konis; kaj la por aliuloj plej granda malhelpo, estis por li rimedo. Ni raportis kiel la malfeliĉega senjorino iun tagon respondis al lia voĉo; kaj la leganto povis kompreni, ke ĝi ne

estis la lasta fojo; fakte ĝi estis nur unua paŝo sur abomena kaj sanga vojo. Tiu sama voĉo, kiu akiris forton kaj preskaŭ aŭtoritaton el krimado, nun ŝin devigis oferi la senkulpulinon al ŝi konfiditan.

Tia propono efikis terure al Gertrude. Perdi Lucia-n senkulpe, pro neatendita kaŭzo, ŝajnus al ŝi granda malfeliĉo, akra puno: nun estis al ŝi ordonite rezigni ŝin eĉ per krima perfido, ŝanĝi pentofaran rimedon en novan rimorson. La malfeliĉa provis ĉiujn vojojn, por eskapi el la horora ordono; ĉiujn, escepte la ununuran sekuran, kiu restis daŭre malfermita antaŭ ŝi. La krimo estas rigora kaj nefleksebla tirano, kontraŭ kiu fortikas nur la homo kiu tutece ribelas je ĝi. Tion ĉi Gertrude ne intencis decidi; kaj ŝi obeis.

Alvenis la fiksita tago; la interkonsentita horo proksimiĝis; Gertrude, apartiĝinte kun Lucia en sia privata vizitejo, faris al ŝi pli multe da karesoj ol kutime, kaj Lucia ilin ricevis kaj reciprokis kun pli kaj pli da tenereco: kiel ŝafo, tremetante sentime sub la mano de l' paŝtisto kiu ĝin palpas kaj milde trenas, sin turnas por tiun manon leki, ne sciante, ke ekster la stalo ĝin atendas la buĉisto, al kiu la paŝtisto ĵus vendis ĝin.

«Mi bezonas grandan servon; kaj nur vi povas al mi ĝin plenumi. Mi havas plurajn personojn sub mia komando; sed neniun fidindan. Por afero tre grava, kiun mi al vi malkaŝos pli poste, mi bezonas tuj-tuj paroli kun tiu patro gardanto de l' kapucenoj, kiu vin kondukis ĉi tien, mia povra Lucia; sed ankaŭ nepras, ke neniu eksci, ke mi mem venigis lin. Mi havas nur vin, por al li transdoni sekrete tiun ĉi mesaĝon».

Ĉe tia postulo, Lucia estis terurita. Por liberiĝi el tiu tasko, kun sia tuta humileco, sed ne kaŝante sian grandan

miron, ŝi tuj prezentis la motivojn, kiujn la senjorino devus kompreni kaj prognozi: sen patrino, sen iu ajn, tra senhoma vojo, en ne konata urbeto... Sed Gertrude, instruite ĉe infera lernejo, esprimis siaflanke tian miron, tian ĉagrenon pro tiom da sindeteno en la persono, je kiu ŝi kredis ke ŝi rajtas plej multe fidi, kaj ŝi ŝajnis tiujn pretekstojn tiel vanaj! Dum hela tago, distance nur kelkpaŝe, tra vojo trairita de ŝi antaŭ nelonge, kaj pri kiu, eĉ neniam vidinte ĝin, ŝi tute ne povas erari, se oni ĝin al ŝi instruas!... Tiom multe ŝi diris, ke la kompatinda, kortuŝite kaj samtempe pikite, elbuŝigis: «nu; kion mi faru?».

«Iru al la kapucenejo», kaj ŝi denove priskribis la vojon: «vokigu la patron gardanton; al li tute aparte diru, ke li venu al mi senprokraste; sed li al neniu diru, ke mi mem venigas lin».

«Sed kion mi diros al la farmistino, kiu neniam vidis min eliri, kaj demandos min, kien do mi iras?». «Strebu pasi nevidate; kaj se vi ne sukcesos, diru al ŝi, ke vi iras al tiu-tia preĝejo, kie vi promesis preĝi».

Nova malfacilo por la povra junulino: diri mensogon; sed la senjorino denove montris sin tiel afliktita pro l' kontraŭdiroj, kaj ke estas plej abomeninda afero tio, ke ŝi preferas vanan skrupulon anstataŭ dankemo, ke Lucia, konsternite pli ol konvinkite, kaj plej emociite, respondis: «nu; mi iros. Helpu min Dio!». Kaj ŝi ekiris.

Gertrude, kiu el la krado ŝin sekvis per fiksa kaj sombra okulo, vidante ŝin atingi la sojlon, kvazaŭ venkite per ne-rezistebla sento, malfermis la buŝon, kaj diris: «aŭskultu Lucia!». Ĉi-lasto sin turnis, kaj revenis al la krado. Sed alia penso, kutima superregi, jam venkis denove en la malfeliĉa menso de Gertrude. Ŝajnigante sin ne kontenta pri la jam

donitaj instrukcioj, ŝi denove klarigis al Lucia la irotan vojon, kaj ŝin forsalutis, dirante: «faru ĉion kiel mi al vi diris, kaj revenu rapide». Lucia foriris.

Ŝi transiris ne rimarkite la monakinejan pordegon, ŝi ekiris la straton, kun mallevitaj okuloj, tuŝe al la muro; ŝi trovis, laŭ la ricevitaj instrukcioj kaj siaj memoroj, la urbetpordegon, tra ĝi eliris, kaj, tute absorbite kaj iom tremante, ŝi trairis la ĉefan vojon, kaj post kelke da momentoj ŝi atingis kaj rekonis tiun, kiu kondukis al la kapucenejo. Ĝi estis, kaj ankoraŭ estas, profunda, kvazaŭ river-fluejo, inter du altaj bordoj kovritaj de vepro, kiuj formas super ĝi specon de volbo. Lucia, enirante, kaj vidante ĝin tute senhoma, sentis la timon kreski, kaj plirapidigis la paŝadon; sed post nemulte ŝi iom trankviliĝis, vidante vojaĝan kaleŝon haltanta, kaj apud ĝi, antaŭ la malfermita kaleŝ-pordeto, du vojaĝantojn rigardantaj ĉi-tien kaj tien, kvazaŭ malcertaj pri la vojo. Plu irante, ŝi aŭdis unu el la duopo, kiu diris: «jen bonkora junulino, kiu al ni montros la vojon». Fakte, kiam ŝi atingis la kaleŝon, tiu sama viro, kun maniero pli ĝentila ol lia aspekto, sin turnis kaj diris: «ho junulino, ĉu vi scipovus indiki al ni la vojon por Monza?». «Veturante tien, viaj moŝtoj iras inversen», respondis la povrulino: «Monza estas ĉi-flanke...», kaj ŝi turnis sin, por indiki per la fingro; kiam la alia kompano (temis pri la Milvo), subite kaptege ŝin ĉe la talio, ŝin levis de-tere. Lucia re-turnis la kapon terurite, kaj eligis kriegon; la kanajlo ŝin enkaleŝigis perforte: viro kontraŭ-sidanta ŝin kaptis kaj, malgraŭ ŝiaj baraktoj kaj ŝrikoj, li ŝin puŝe sidigis fronte al li: alia, metante naz-tukon en ŝian buŝon, al ŝi baris la krion engorĝe. Dume ankaŭ la Milvo enkaleŝigis plej rapide: la pordeto fermiĝis, kaj la kaleŝo ekruliĝis rapidege. La viro al ŝi

farinta tiun perfidan demandon, restinte surstrate, turnis la rigardon ĉi-tien kaj tien, por vidi, ĉu oni alkuris ĉe l' kriegoj de Lucia: neniu estis; tiam li kaptis branĉon de l' vepraro, kaj saltis sur la strat-bordon, kaj malaperis. Temis pri bravulaĉo de Egidio; li estis atendinta, ŝajnigante indiferecon, ĉe l' pordo de sia mastro, por vidi, kiam do Lucia forlasas la monakinejon; li ŝin observis atente, por povi rekoni ŝin; kaj li estis kurinta tra kurtvojo, por ŝin atendi en la interkonsentita loko.

Kiu povos nun priskribi ŝian teruron, ŝian angoron, esprimi tion, kio ŝian animon trapasis? Ŝi malfermegis la teruritajn okulojn, anxie dezirante ekkoni sian hororan situacion, kaj tuj ŝi refermis ilin, pro l' abomeno kaj teruro de tiuj fi-vizaĝoj; ŝi tordis sin, sed ĉiuflanke ŝi estis tenata; ŝi kolektis ĉiujn siajn fortojn, kaj ekskuegis, por sin ĵeti al la pordeto; sed du dikmuskolaj brakoj ŝin tenis kvazaŭ fiksita sur la fundo de l' kaleŝo; kvar aliaj manaĉoj tenis tie ŝin premita. Ĉiufoje kiam ŝi malfermis la buŝon por eligi kriegon, la naztuko sufokis ĝin engorĝe. Dume tri inferaj buŝoj, kun voĉo laŭ-pove plej humana, ripetadis: «silentu, silentu, ne timu, ni ne volas fari al vi malbonon». Post kelkmomenta lukto tiel angora, ŝi ŝajnis kvietiĝi; ŝi malstreĉis la brakojn, retro-faligis la kapon, levis apenaŭ la palpebrojn, tenante la okulon senmova; la hororaj fi-vizaĝoj, starantaj antaŭ ŝi, ŝajnis konfuziĝi kaj ondumi en monstreca miksaĵo; la koloro forfuĝis el ŝia vizaĝo; frida ŝvito ĝin kovris; ŝi sin delasis, kaj svenis.

«Nu, nu, kuraĝe», diradis la Milvo. «Kuraĝe, kuraĝe», ripetadis la aliaj du kanajloj; sed la perdo de ĉiuj sensoj evitis al Lucia aŭdi la konsolojn de tiaj hororaj voĉoj.

«Diable! ŝi ŝajnas mortinta», diris unu el ili: «kaj kio, se ŝi

estus vere mortinta?».

«Ho! ĉu mortinta!» diris la alia: estas nur unu el la svenoj, kiuj trafas virinojn. Mi ja scias, ke kiam mi volis elmondigi homon, ĉu viron, ĉu virinon, ege pli multe mi bezonis».

«Nu!» diris la Milvo: «zorgu vian devon, kaj alion ne strebu. Elkestigu la blunderbuzojn, kaj tenu ilin pretaj; ĉar en ĉi-arbaro, en kiun ni eniras nun, ĉiam kaŝiĝas kanajloj. Ne tiel enmane, diable! Demetu ilin dorse: ĉu vi ne vidas, ke ŝi estas kvazaŭ malseka kokido, kiu svenas pro neniaĵo? Se ŝi vidus armilojn, ŝi povus eĉ vere morti. Kaj kiam ŝi rekonsciiĝos, tute zorgu ne teruri ŝin; vi ne ŝin tuŝu, se mi ne gestas al vi; por teni ŝin, sufiĉas mi mem. Kaj vi silentu: lasu ke nur mi parolu».

Dume la kaleŝo, plu kurante, jam interniĝis en la arbaron.

Post iom da tempo, la povra Lucia rekonsciiĝis, kvazaŭ el profunda kaj anhela dormo, kaj malfermis la okulojn. Ŝi iom penis distingi la terurajn ĉirkaŭajn objektojn, kolekti siajn pensojn: fine ŝi konsciis denove sian teruran situacion. Ŝia unua apliko de l' malmultaj reakiritaj fortoj, estis denova elano al la kaleŝ-pordo, por sin ĵeti eksteren; sed oni ŝin retenis; kaj ŝi nur povis vidi momente la sovaĝan izolecon de la loko, tra kiu ŝi pasas. Ŝi eligis denovan kriegon; sed la Milvo, levante sian manaĉon kun la naztuko, «nu», li al ŝi diris, laŭpove plej dolĉe: «silentu, kaj estos des pli bone por vi: ni ne volas fari al vi malbonon; sed, se vi ne silentas, ni mem silentigos vin».

«Lasu min iri! Kiuj vi estas? Kien vi kondukas min? Kial vi kaptis min? Lasu min, lasu min!».

«Mi al vi ripetas, ke vi ne timu: vi ne estas infano, kaj vi devas kompreni, ke ni ne volas fari al vi malbonon. Ĉu vi ne

vidas, ke ni jam centfoje povus mortigi vin, se ni havus malicajn intencojn? Restu do kvieta».

«Ne, ne, lasu min iri laŭ mia vojo: mi ne konas vin».

«Sed ni mem konas vin».

«Ho plej sankta Virgulino! Kiel vi konas min? Lasu min iri, pro amo al Dio. Kiuj vi estas? Kial vi kaptis min?»

«Ĉar oni tion al ni ordonis».

«Kiu? kiu? kiu do povis tion ordoni?». «Silentu!» diris kun severa mienaĉo la Milvo: «ĉi tiajn demandojn oni tute ne faru al ni».

Lucia provis denove elani al la pordeto; sed vidante ke tio estas senefika, ŝi denove sin turnis al petegoj; kaj, kun mallevita kapo, kun larmo-fluaj vangoj, kun voĉo rompita de l' ploro, kun la manoj kunmetitaj antaŭ la lipoj, «ho!» ŝi diris: «pro amo al Dio kaj la plej sankta Virgulino, lasu min! Kian malbonon mi faris al vi? Mi estas povra kreitaĵo, kiu nenion al vi faris. Tion kion vi mem faris al mi, el tuta koro mi pardonas; kaj mi preĝos Dion por vi. Se vi mem havas filinon, edzinon, patrinon, pensu, kion ili suferus, se ili estus en ĉi tia situacio. Memoru, ke ni ĉiuj devas morti, kaj vi iam dezirus, ke Dio kompatu vin. Lasu min, lasu min ĉi tie: la Di-Sinjoro trovigos al mi la vojon».

«Ni ne rajtas».

«Ĉu vi ne rajtas? Ho Sinjoro! kial do vi ne rajtas? Kien vi volas konduki min? Kial?...». «Ni ne rajtas: estas vane: ne timu, ĉar ni ne volas fari al vi malbonon: restu kvieta, kaj neniu tuŝos vin».

Angoro-plena, anhela, pli kaj pli terurita, konstatante, ke ŝiaj vortoj tute ne impresas, Lucia sin turnis al Tiu kiu tenas enmane la homajn korojn, kaj povas, se Li volas, eĉ la plej

malmolajn moligi. Ŝi kiel eble plej retiriĝis en kaleŝ-angulon, krucigis la brakojn surbruste, kaj preĝis kelktempe medite; poste, elpoŝiginte la rozarion, ŝi komencis ĝin trapreĝi, kun kredo kaj sento pli intensaj ol iam ajn dum sia vivo. De temp' al tempo, esperante, ke ŝi elpetis la sopiratan kompaton, ŝi turnis sin, por denove ilin petegi; sed ĉiufoje vane. Pli poste ŝi ankoraŭ refalis senkonscia, poste ŝi denove rekonsciiĝis, por travivi denovajn angorojn. Sed jam nun nia koro ne eltenas ilin priskribi pli longe: tro ĉagrena kompatato nin rapidigas al la fino de tiu vojaĝo, kiu daŭris pli ol kvar horoj; kaj post kiu ni havos aliajn angorajn horojn por travivi. Ni do transiĝu al la kastelo, kie la malfeliĉulino estis atendata.

Ŝin atendis la nenomito, kun nekutimaj malkvietoj kaj suspenso. Stranga afero! tiu viro, disponinta frid-sange pri tiom da homaj vivoj, kiu ĉe siaj multaj misfaroj kalkulis neniaĵo la suferojn kiujn li mem kaŭzis, krom por foje tragusti sovaĝan venĝo-volupton, nun, kaptante tiun ĉi nekonatinon, ĉi povran kampulinon, li sentis kvazaŭ abomenon, preskaŭan teruron. De alta fenestro de sia kastelaĉo, li jam iom longe rigardis al la elfluejo de la valo; kaj jen li vidas la kaleŝon aperi, kaj veni malrapide: ĉar tiu unua rapidega galopado jam konsumis la impeton kaj elĉerpis la fortojn de l' ĉevaloj. Kaj kvankam, el kie li rigardis, ĝi aspektis ne pli granda ol unu el la kaleŝetoj, kiujn oni donacas kiel ludilojn al infanoj, li tuj rekonis ĝin, kaj eksentis sian koron bati pli forte.

– Ĉu ŝi enestos? – li tuj pensis; kaj li daŭrigis en si mem: – kian tedon ŝi al mi kaŭzas! Mi tuj liberigu min de ŝi. –

Kaj li volus voki unu el siaj bravulaĉoj, kaj tuj sendi lin al la kaleŝo, kaj ordoni al la Milvo, ke li turnu kaj veturigu ŝin al la palaco de Don Rodrigo. Sed ordona «*ne!*», kiu eksonis en

lia menso, faligis tiun intencon. Tamen, turmentate per la bezono ion ordoni, ĉar ŝajnis al li netolereble atendadi nenifare tiun kaleŝon, kiu venis paŝon post paŝo, kvazaŭ perfido, kion mi scias? kvazaŭ plago, li vokigis iun oldan virinon.

Ŝi estis naskita en tiu sama kastelo, el iama kastelgardanto, kaj tie ŝi estis travivinta sian tutan vivon. Tio, kion ŝi vidis kaj aŭdis ek de vindo-aĝo, en ŝian menson stampis grandiozan kaj teruran koncepton pri l' potenco de ŝiaj mastroj; kaj la ĉefa principo, kiun ŝi ĉerpis el instrukcioj kaj ekzemploj estis, ke nepras ilin obei en ĉiu ajn afero, ĉar ili povas fari kaj multege da malbono kaj multege da bono. La devo-sento, ĝerme demetita en la koro de ĉiuj homoj, evoluante en ŝi kune kun la sentoj de respekto, teruro, servema avideco, asociiĝis kaj adaptiĝis al tiuj sentoj. Kiam la nenomito, fariĝinte mastro, komencis apliki tiel terure sian forton, ŝi eksentis ian abomenon sed samtempe pli profundan senton de submetiĝo. Ĉe l' tempo-paso, ŝi kutimiĝis al tio, kion ŝi tuttage havis antaŭ la okuloj kaj en la oreloj: la potenca kaj sembremsa volo de tia senjoro estis laŭ ŝi speco de fatala justeco. Fariĝinte plenkreska, ŝi edzigis dom-serviston, kiu, irinte post ne multe al risiko-plena ekspedicio, forlasis siajn ostojn survoje, kaj ŝin vidvino enkastele. La venĝo, kiun la senjoro tuj faris, havigis al ŝi sovaĝegan konsolon, kaj pliigis ŝian orgojlon pri tia protektado. De post tiam, ŝi nur tre malofte elpaŝis ekster la kastelo; kaj iom post iom restis al ŝi pri homa vivo preskaŭ neniam ideoj, krom tiuj, kiujn ŝi ricevis en tiu loko. Ŝi ne havis difinitan taskon, sed en tiu fi-kolekto de bravulaĉoj, jen unu jen alia komisiis al ŝi ion por fari; kaj tio kaŭzis al ŝi ronĝon. Jen ŝi devis fliki ĉifonojn, jen prepari

rapide manĝon al revenantoj el ekspedicio, jen pansi⁴ vunditojn. Kaj iliaj ordonoj, iliaj riproĉoj kaj dankesprimoj, estis spicitaj per moko kaj insultoj: oldulino, estis ŝia kutima vok-nomo; la aldonajoj, kiujn oni ĉiufoje algluis, variis laŭ la cirkonstancoj kaj la humoro de la amiko. Kaj ŝi, ĝenate en sia mallaboremo, kaj provokite en sia kolero, du el ŝiaj ĉefpasioj, foje reciprokis tiujn komplimentojn per vortoj, en kiuj Satano rekonus da sia talento pli multe ol en tiuj de ŝiaj provokantoj.

«Ĉu vi vidas tie sube tiun kaleŝon!» al ŝi diris la senjoro.

«Mi vidas ĝin», respondis la oldulino, elŝovante la pintan mentonon, kaj streĉante la kavajn okulojn, kvazaŭ por ilin eligi el la orbitoj.

«Vi tuj aranĝigu fermitan portoseĝon, eniru en ĝin, kaj portigu vin ĝis la Misnokto. Tuj rapidu; tiel ke vi tien alvenu antaŭ tiu kaleŝo: fakte ĝi avancis per morto-paŝo. En tiu kaleŝo sidas... devus sidi... junulino. Se ŝi tie sidas, diru al la Milvo, mianome, ke li sidigu ŝin en la portoseĝon, kaj li mem tuj atingu min. Vi sidas en la portoseĝo kune kun tiu... junulino; kaj kiam vi estos ĉi-supre, vi ŝin kondukos en vian ĉambron. Se ŝi demandas, kien do vi ŝin kondukas, kaj al kiu apartenas la kastelo, gardu vin, ne...».

«Ho!» diris la oldulino.

«Sed», daŭrigis la nenomito, «kuraĝigu ŝin».

«Kion mi al ŝi diru?».

«Kion vi al ŝi diru? Kuraĝigu ŝin, mi diras. Ĉu vi atingis ĉi tiun aĝon ne sciante, kiel kuraĝigi homon, kiam oni volas! Ĉu neniam vi sentis angoron ankore? Ĉu neniam vi sentis teruron? Ĉu vi ne scias la vortojn, kiuj en tiaj momentoj plezurigas? Tiajn vortojn diru: trovu da ili, diable. For».

⁴ pansi: purigi, desinfekti kaj bandaĝi vundon.

Kaj kiam ŝi foriris, li iom haltis ĉe l' fenestro, fiksrigardante tiun kaleŝon, kiu nun aspektis multe pli granda; poste li levis la okulojn al la suno, kiu tiumomente kaŝiĝis malantaŭ la montaro; poste li rigardis la nubojn disajn supre, kiuj el brunaj preskaŭ subite fariĝis fajraj. Li retiriĝis, fermis la fenestron, kaj komencis paŝi tien kaj reen en la ĉambro, kvazaŭ hastema vojaĝanto.

XXI

La oldulino jam rapidis kaj obei kaj ordoni per la aŭtoritato de tiu nomo, kiu, eldirite de iu ajn en tiu loko, tute urĝis ĉiujn; ĉar ne estis imageble, ke oni aŭdacus eluzi ĝin false. Fakte ŝi atingis la Misnokton iom antaŭ l' alveno de l' kaleŝo; kaj vidinte ĝin alveni, ŝi eliris el la fermita portoseĝo, gestis al la koĉero, ke li haltigu, proksimiĝis al la kaleŝpordeto; kaj al la Milvo, kiu elŝovis la kapon, ŝi mallaŭte raportis la ordonojn de l' mastro.

Ĉe l' halto de l' kaleŝo, Lucia skuiĝis kaj rekonsciiĝis el kvazaŭa letargio. Ŝi denove sentis la sangon tempesti, kaj ekrigardis gape. La Milvo retiriĝis; kaj la oldulino, rigardante Lucia-n kun la mentono ĉe l' kaleŝpordeto, diris: «venu, mia junulino; venu, povrulino; venu kun mi, kiu ricevis ordonon trakti vin humane, kaj kuraĝigi vin».

Aŭdante virinan voĉon, la povrulino eksentis konsolon, momentan kuraĝon; sed tuj ŝi refalis en plej sombran teruron. «Kiu vi estas?» ŝi diris kun tremanta voĉo, gape rigardante la oldulinan vizaĝon.

«Venu, venu, povrulino», ripetadis ĉi-lasto. La Milvo kaj la aliaj du viroj, divenante, el ŝiaj parolo kaj eksterordinare mildigita voĉo, la intencojn de la senjoro, klopodis persvadi bontone la prematinon al obeo. Sed ŝi plu rigardis eksteren; kaj kvankam la sovaĝa kaj nekonata loko, kaj la sekureco de ŝiaj gardantoj ne lasis al ŝi esperon pri helpo, ŝi tamen malfermis la buŝon por kribi; sed vidante la Milvon okulumi pri buŝum-tuko, ŝi retenis la krion, ekstremis, tordiĝis; oni ŝin kaptis kaj sidigis en la portoseĝon. Pli poste eniris la oldulino; la Milvo ordonis al la aliaj du fiuloj postmarŝi, kaj li rapidis supren, alkure al la mastraj ordonoj.

«Kiu vi estas?» angore demandis Lucia al la nekonata, deforma fi-vizaĝo: «kial mi estas kun vi? kie mi estas? kien vi kondukas min?».

«Al homo, kiu volas bonfari al vi», respondis la oldulino, «al granda... feliĉas tiuj, al kiuj li volas bonfari. Bonŝance al vi, bonŝance al vi. Ne timu, estu gaja, ĉar li al mi ordonis kuraĝigi vin. Vi al li diros, ĉu ne, ke mi kuraĝigis vin?».

«Kiu li estas? kial? kion li volas de mi? Mi ne apartenas al li. Diru al mi, kie do mi estas; kaj lasu min; diru al tiuj viroj, ke ili lasu min, ke ili konduku min en ian preĝejon. Ho! vi, kiu estas virino, enorme de la Virgulino Maria...!»

Tiu sankta kaj dolĉa nomo, iam ripetata kun respekto en la unuaj vivo-jaroj, kaj longtempe ne plu alvokita, kaj verŝajne eĉ ne plu aŭdita, estigis en la menso de l' malfeliĉega, kiu ĝin aŭdis tiumomente, konfuzan, strangan, malviglan impreson, kvazaŭ memoron pri lumo en tute maljuna homo, blindiĝinta kiam li estis infano.

Dume la nenomito, stare ĉe l' kastel-pordego, suben rigardis; kaj li vidis la fermitan portoseĝon veni hom-paŝe, kiel ĵustempe la kaleŝon, kaj li vidis la Milvon, kiu antaŭkuris pli kaj pli distanciĝante de ĝi. Kiam li atingis la kulminon, la senjoro al li ordon-gestis sekvi lin; kaj eniris kun li iun kastelan ĉambron.

«Kio do?», li diris, tie haltante.

«Ĉio akurate», respondis, sin klinante, la Milvo: la avizo ĝustatempe, la virino ĝustatempe, neniu surloke, nur unu kriego, neniu aperis, la koĉero pretis, la ĉevaloj bravis, nenia renkonto: sed...». «Sed kio?». «Sed... mi diras la veron, ke mi pli multe ŝatus, se mi estus ricevinta ordonon pafi en ŝian dorson, kaj ne aŭdi ŝin paroli, nek vidi ŝian vizaĝon».

«Kio? kio? kion volas vi diri?».

«Mi volas diri, ke dum tiu tuta tempo, dum tiu tuta tempo... ŝi kaŭzis al mi tro da kompato».

«Ĉu kompato! Kion vi scias pri kompato? Kio do estas kompato?».

«Mi neniam tiel bone komprenis ĝin, kiel ĉi-foje: okazas pri kompato... iom kiel pri teruro: se lasi ĝin regi, oni ne plu estas viro».

«Mi aŭdu, kion do ŝi faris, por estigi en vi kompaton».

«Ho eminentega! Tiom longe...! ploradi, preĝadi, kaj tiel mieni per la okuloj, kaj fariĝi tute blanka, kiel morta, kaj poste singulti, kaj denove preĝi, kaj certaj vortoj...».

– Mi ne volas ŝin hejme, – pensis dumtempe la nenomito. – Estis azenaĵo, ke mi devontigis min; sed mi promesis, mi promesis. Kiam ŝi estos for... – Kaj levante la kapon ordongeste direkte al la Milvo, «nun», li diris, «forigu la kompaton: surĉevaliĝu, prenu kunulon, eĉ du, se vi volas; kaj rapidu al la domo de tiu Don Rodrigo, kiun vi scias. Diru, ke li sendu... ja senprokraste, ĉar se...».

Sed alia interna *ne!*, pli ordonema ol la unua, al li malpermesis fini la frazon. «Ne», li diris rezolute, kvazaŭ por esprimi al si mem la ordonon de tiu sekreta voĉo, «ne: iru dormi; kaj morgaŭ matene... vi faros tion, kiom mi al vi diros!».

– Ian diablon ŝi havas siaflanke, – li pensis poste, restinte sola, stare, kun la brakoj krucitaj surbruste, kaj senmova rigardo celita al parto de la planko, kie lunradio, eniranta tra alta fenestro, desegnigis kvadraton el pala lumo, ŝak-tabule tranĉita per la dikaj ferkradoj, kaj tajlita pli partete per la vitralo-fakoj. – Ian diablon... aŭ anĝelon, kiu ŝin protektas...

Kompaton al la Milvo!... Morgaŭ, morgaŭ frue, ŝi for de ĉi tie; al sia destino, kaj oni ne plu parolu pri tio, kaj, – li daŭrigis en si mem, kun la sento de ordonanto al malobeema knabo, konsciante, ke li fakte ne obeos, – kaj oni ne plu pensu pri tio. Tiu bestaĉo, nome Don Rodrigo, ne venu rompi al mi la kapon per dankoj; ĉar... mi ne volas plu aŭdi pri ŝi. Mi faris al li servon, ĉar... ĉar mi promesis: kaj mi promesis ĉar... estas mia destino. Sed mi volas, ke li abunde repagu tiun ĉi servon. Mi vidu do... –

Kaj li cerbumis, kion aspran postuli kompanse, kvazaŭ pune; sed denove trairis lian menson tiuj vortoj: kompaton al la Milvo! – Kiel ŝi efikis tion? – li daŭrigis, absorbite de tiu penso. – Mi volas vidi ŝin... He! ne... Jes, mi volas vidi ŝin –.

Kaj irante de ĉambro al ĉambro, li trovis la etan ŝtuparon, supreniris palpserĉe, ĝis la ĉambro de la oldulino, kaj frapis la pordon piedbate.

«Kiu estas?».

«Malfermu».

Aŭdante tiun voĉon, la oldulino alsaltis; kaj tuj aŭdiĝis la riglilo ŝoviĝi tra la ringoj, kaj la pordo tute malfermiĝis. El la sojlo la nenomito ekrigardis ĉirkaŭen; kaj ĉe la lumo de lampeto, kiu brilis sur eta tablo, li vidis Lucia-n buliĝinta surplanke en angulo, plej for de la pordo.

«Kiu al vi diris ĵetaĉi ŝin tien, kvazaŭ sakon da ĉifonoj, ho malfeliĉega?» li diris al la oldulino kun koler-plena rigardo.

«Ŝi kuŝigis sin, kie al ŝi plaĉis», ŝi respondis humile: «mi faris ĉion eblan por kuraĝigi ŝin: ŝi mem povas tion atesti; sed neniu rimedo sukcesis».

«Stariĝu», diris la nenomito al Lucia, apudiĝante al ŝi. Sed Lucia, ĉe kiu la pordo-frapo, la malfermo, la apero de tiu

viro, ties vortoj, aldonis novan teruron al la jam terurita animo, restis tute buliĝinta en tiu anguleto, kun la vizaĝo kaŝita intermane, senmova, preter tio, ke ŝi tute tremis.

«Stariĝu, ĉar mi ne volas fari al vi malbonon... kaj mi povas al vi bonfari», ripetis la senjoro... «Stariĝu!» ektondris pli poste tiu voĉo, koleriĝinte, ke ĝi dufoje ordonis vane.

Kvazaŭ vigligite per la teruro, la malfeliĉega tuj leviĝis surgenu; kaj kunigante la manojn, kiel antaŭ sankta bildo, ŝi levis la okulojn al la vizaĝo de l' nenomito, kaj tuj mallevante ilin, diris: «jen mi: murdu min».

«Mi al vi diris, ke mi ne intencas fari al vi malbonon», respondis kun mildigita voĉo la nenomito, fiksrigardante tiun vizaĝon perturbitan de konsterno kaj teruro.

«Kuraĝe, kuraĝe», diradis la oldulino: «se li mem al vi diras, ke li ne volas fari al vi malbonon...».

«Kial do» reparolis Lucia, kun voĉtono, en kiu, kune kun timtremo, oni perceptis firmecon el malespera indigno, «kial do vi al mi suferigas inferajn turmentojn? Kion faris mi kontraŭ vin?...».

«Ĉu eble oni vin mistraktis? Parolu».

«Ho mistraktis! Oni min kaptis perfide, perforte! kial? kial oni min kaptis? kial mi estas ĉi tie? kie mi estas? mi estas povra kreitaĵo: kion mi faris kontraŭ vin? Ennome de Dio...».

«Dio, Dio», interrompis la nenomito: «ĉiam Dio: ne povantoj sin defendi per si mem, estante senfortaj, ĉiufoje havas tiun ĉi Dion por prezenti, kvazaŭ parolinte kun li. Kion vi postulas per ĉi-tiu vorto. Ĉu igi min...?». Kaj li stumpigis la frazon.

«Ho Sinjoro! ĉu postuli! Kion do povus postuli mi, mizera, krom ke vi mizerikordu al mi? Dio pardonas multe da

aferoj, pro unu mizerikorda faro! Lasu min libera, pro amo al Dio, lasu min min libera! Homo, kiu iam devos morti, nenion gajnas suferigante tiom multe povran kreitaĵon. Ho! vi, kiu povas ordoni, diru, ke oni delasu min! Oni portis min ĉi tien perforte. Sendu min kun tiu ĉi virino al ***, kie estas mia panjo! Ho sanktega Virgulino! mia panjo, mia panjo, pro kompatato, mia panjo! Eble ŝi ne estas for de ĉi tie... mi vidis miajn montojn! Kial vi suferigas min? Kondukigu min al ia preĝejo. Mi preĝos por vi, dum mia tuta vivo. Kiom al vi kostas, eldiri unu vorton? Ho jen! mi vidas ke vi eksentas kompaton: diru unu vorton, diru ĝin. Dio pardonas multe da aferoj, pro unu mizerikorda faro!».

– Ho kial ŝi ne estas filino de unu el la hundaĉoj, kiuj ekzilis min! – pensis la nenomito: – de unu el tiuj malbravuloj, kiuj volus min morta! mi nun ĝojus pro ĉi tia kriado; sed male... –

«Ne forpelu bonan inspiron!» daŭrigis fervore Lucia, kuraĝigite, vidante heziton en la vizaĝo kaj sinteno de sia tirano. «Se vi ne faras al mi ĉi tiun karitaton, ĝin faros al mi la Di-Sinjoro: li igos min morti, kaj por mi estos fino; sed vi!... Eble iam ankaŭ vi mem... Sed ne, ne; ĉiam mi preĝos la Di-Sinjoron, ke li gardu vin kontraŭ ĉia malbono. Kiom al vi kostas diri unu vorton? Se vi travivus ĉi tiajn turmentojn...!».

«Nu, kuraĝe», interrompis la nenomito, kun ia dolĉeco, kiu tute mirigis la oldulinon. «Ĉu mi faris al vi malbonon? Ĉu mi minacis vin?».

«Ho ne! Mi vidas, ke vi estas bonkora, kaj vi sentas kompaton por ĉi povra kreaĵo. Se vi volus, vi povus teruri min, pli ol ĉiuj ceteraj, vi povus mortigi min; kaj male vi... iom malpezigis mian koron. Dio vin rekompencos laŭmerite.

Plenumu la mizerikordan faron, liberigu min, liberigu min».

«Morgaŭ matene...».

«Ho liberigu min tuj, senprokraste...».

«Morgaŭ matene ni revidiĝos, mi diras. Nu, intertempe vi kuraĝu. Ripozu. Tutversajne vi bezonas manĝon. Nun oni al vi portos da ĝi».

«Ne, ne; mi mortas, se iu eniras ĉi tien: mi mortas. Vi mem konduku min en preĝejon... Tiujn paŝojn Dio kalkulos viafavore».

«Venos virino porti al vi manĝon», diris la nenomito; kaj tion dirinte, li mem miris, ke li elpensis tian rimedon, ke li sentis la bezonon eltrovi ĝin, por trankviligi virineton.

«Kaj vi», li tuj daŭrigis, sin turnante al la oldulino, «kuraĝigu ŝin, ke ŝi manĝu; dormigu ŝin en ĉi-lito: kaj se ŝi volas havi vin kune, bone; se ne, dum unu nokto vi ja povas dormi surplanke. Kuraĝigu ŝin, mi ripetas; gardu ŝin gaja. Kaj ke ŝi ne plendu pri vi!».

Tion dirinte, li ekrapidis al la pordo. Lucia leviĝis kaj ekkuris, por lin reteni kaj renovigi sian petegon; sed li jam malaperis.

«Ho ve al mi! Fermu, fermu tuj. Kaj aŭdinte kunfrapi la pordo-klapojn, kaj ŝovi la riglilon, ŝi denove buliĝis en sia anguleto. «Ho ve al mi!» ŝi denove elkriis singultante: «kiun preĝi nune? Kie mi estas? Diru, diru al mi, pro amo al Dio, kiu estas tiu senjoro... tiu, kiu al mi parolis?».

«Kiu estas, ĉu? kiu estas? Vi volas, ke mi tion diru al vi. Ci atendu, ke mi ĝin diru al ci. Ĉar li protektas vin, vi pufiĝis; kaj volas vi mem kontentiĝi, kaj ruinigi min. Demandu lin mem. Se mi kontentigus vin ankaŭ super ĉi tio, mi ne ricevus la belajn vortojn, kiujn vi aŭdis. – Mi estas maljuna, maljuna,

– ŝi daŭrigis murmurante interdente. – Malbenataj la junulinoj, kiuj aspektas bele kaj plorante kaj ridante, kaj ĉiam pravas. – Sed, aŭdante Lucia-n singulti, kaj rememorante la minacan ordonon de l' mastro, ŝi kliniĝis al la povra buliĝinta, kaj kun mildigita voĉo, ŝi reparolis: «nu, mi al vi diris nenion malbonan; estu gaja. Ne demandu aferojn, kiujn mi ne povas diri; cetere, vi restu trankvila. Ho, se vi scius, kiom da homoj ŝatus aŭdi lin paroli en ĉi tia maniero! Estu gaja, ĉar baldaŭ venos io por manĝi; kaj mi, kiu komprenas... el la maniero de liaj vortoj, ĝi estos manĝo bongusta. Kaj poste vi enlitiĝos, kaj... vi lasos loketon ankaŭ por mi, espereble», ŝi aldonis, kun voĉo kontraŭvole kolereta.

«Mi ne volas manĝi, ne volas dormi. Lasu min tia, ne proksimiĝu; ne foriru de ĉi tie!».

«Ne, ne, nu», diris la oldulino; kaj ŝi retiriĝis, kaj sidigis sin sur seĝaĉo, de kie ŝi turnis al la povrulino rigardaĉojn samtempe teruritajn kaj rankorajn; poste ŝi rigardis al sia aĉa kuŝejo, kaj ŝin rongis la penso, ke eble dum la tuta nokto ŝi estas ekskluzivota, kaj ŝi grumblis kontraŭ malvarmon. Sed ŝi ĝojis pensante pri la vespermanĝo, kaj la espero ke da ĝi estos ankaŭ por ŝi. Lucia ne rimarkis malvarmon, ne sentis malsaton kaj, kvazaŭ ŝtonmirigita, ŝi havis nur konfuzan senton pri siaj ĉagrenoj, eĉ pri siaj teruroj, simile al la imagoj sonĝataj de februlo.

Ŝi skuiĝis, kiam ŝi aŭdis frapeti; kaj, levante la teruritan vizaĝon, ŝi ekkriis: «kiu estas? kiu estas? Neniu venu!».

«Nenio, nenio; bonaj novaĵoj», diris la oldulino: «estas Marta, kiu portas manĝon».

«Fermu, fermu!» kriis Lucia.

«He! tuj-tuj», respondis la oldulino; kaj preninte korbon

el la manoj de tiu Marta, ŝi forsendis ŝin, refermis, venis demeti la korbon sur tablon meze de la ĉambro. Poste ŝi plurfoje invitis Lucia-n veni ĝui tiujn frandaĵojn. Ŝi uzis la vortojn laŭ ŝi plej taŭgajn, por apetitigi la povrulinon, ŝi elbuŝigis elkriojn pri la bongusteco de l' nutraĵoj: «kiam homoj el nia rango sukcesas gustumi ĉi tiajn buŝplenojn, ili memoras ilin longe! El la vino, kiun drinkas la senjoro kun siaj amikoj... kiam venas plej grandaj eminentuloj...! kaj ili volas esti gajaj. Hm!». Sed vidante, ke ĉiuj ĉi-laŭdegoj estas tute vanaj, «vi mem ne volas», ŝi diris. «Sed morgaŭ ne aŭdacu al li diri, ke mi ne kuraĝigis vin. Mi manĝos; kaj postrestos pli ol sufiĉe por vi, kiam vi prudentiĝos, kaj volos obei». Tion dirinte, ŝi komencis manĝi avide. Satiĝinte, ŝi leviĝis, iris al la anguleto, kaj kliniĝinte super Lucia, denove ŝin invitis manĝi, por poste enlitiĝi.

«Ne, ne, nenion mi volas», ŝi respondis, kun febla kaj kvazaŭ dormema voĉo. Poste, pli rezolute, ŝi reparolis: «Ĉu estas riglita la pordo? Ĉu tute riglita?» Ŝi ĉirkaŭrigardis, leviĝis, kaj kun la manoj antaŭen, kun suspektama paŝado, ŝi ekiris tiu-direkten.

La oldulino tien alkuris antaŭ ŝi, etendis la manon al la riglilo, skuis ĝin, kaj diris: «ĉu vi aŭdas? ĉu vi vidas? ĉu tute riglite? ĉu vi estas nun kontenta?».

«Ho, ĉu kontenta! kontenta mi ĉi tie!» diris Lucia, lokante sin denove en sian anguleton. «Sed la Di-Sinjoro ja scias, ke mi ekzistas!».

«Venu enliten: kion do vi volas fari tie, kuŝaĉe kiel hundo? Ĉu oni iam vidis rifuzi komfortojn, kiam ili estas haveblaj?».

«Ne, ne; lasu min tia».

«Vi mem volas tion. Jen mi lasas al vi la pli bonan lokon; mi kuŝigas min sur la rando; mi kuŝos malkomforte por vi. Se vi volas veni enliten, vi ja scias, kion fari. Vi memoru, ke mi petis vin plurfoje». Tion dirinte, ŝi enŝovis sin subkovrilen tute vestita; kaj ĉio eksilentis.

Lucia sidis senmova en tiu anguleto, tute buliĝinta, kun levitaj genuoj, la manoj surgenu, kaj la vizaĝo kaŝita en la manoj. Nek dormo nek maldormo ĝi estis, sed rapida sinsekvo, konfuza disvolvo de pensoj, imagoj, timegoj. Jen pli konsciante, kaj memorante pli detale la hororojn viditajn kaj suferitajn tiutage, ŝi dolore konsideris la cirkonstancojn de la obskura kaj terura realaĵo, en kiu ŝi estas implikita; jen la menso, transportite en eĉ pli obskuran regionon¹, baraktis kontraŭ la fantomoj naskitaj el necerteco kaj teruro. Ŝi restis iom longe en tiu angoro; fine, plej lacega kaj deprimita, ŝi etendis la torporajn membrojn, kuŝigis sin, aŭ fal-kuŝiĝis, kaj dum iom da tempo ŝi restis en stato pli simila al vera dormo. Sed subite ŝi vekiĝis, kvazaŭ pro interna vokiĝo, kaj eksentis la bezonon tute rekonsciiĝi, reakiri sian tutan penso-kapablon, ekkoni, kie do ŝi estas, kiel, kial. Ŝi streĉis l' oreton al iu sono: estis la malrapida, rasla ronkado de l' oldulino; ŝi malfermegis l' okulojn, kaj ŝi vidis intermitan lumeton: estis la lampomeĉo, kiu, estingiĝonte, eligis treman lumon, kaj tuj retiris ĝin, se tiel diri, kiel la iro-reiro de ondo surplaĝe: kaj tia lumo, fuĝante el la objektoj, antaŭ ol ili ricevus el ĝi distingan reliefon kaj koloron, estis por la rigardo nur sinsekvo de tohuvabohuoj. Sed baldaŭ la ĵusaj impresoj, reaperante al la menso, ŝin helpis distingi tion, kio aspektis konfuza al la senso. La malfeliĉa, vekiĝinte, rekonis sian malliberejon: ĉiuj

¹ pli obskuran regionon: konjektadon pri estonteco.

memoroj pri l' horora pasinta tago, ĉiuj teruroj pri l' estonto ŝin atakis samtempe: eĉ tiu nova kvieto post tiom da ekscitoj, tiu speco de ripozo, tiu forlasiteco, estigis en ŝi novan teruron: kaj ŝin ekregis angoro tia, ke ŝi deziris formorti. Sed tiumomente ŝi ekmemoris, ke ŝi povas almenaŭ preĝi, kaj kune kun tiu penso ekestis en ŝia koro kvazaŭ subita espero. Ŝi denove prenis sian rozarion, kaj rekomencis ĝin trapreĝi; kaj laŭgrade ke la preĝo eliris el ŝia tremanta lipo, la koro sentis kreski nedefinitan fidemon. Subite ŝian menson trairis alia penso; nome ke ŝia preĝo estas pli akceptinda, kaj pli certe elaŭdota, se ŝi, en sia afliktiĝo, aldonos oferon. Ĉar en tiu momento ŝia animo nenion sentis krom teruron, nek alion deziris krom liberiĝon, ŝi rememoris tion, kion ŝi havas, aŭ havis plej kara; ŝi rememoris, kaj tuj decidis oferi ĝin. Ŝi leviĝis, kaj surgenuiĝis, kaj tenante ĉebruste la kunmetitajn manojn, el kiuj pendis la rozario, ŝi levis la vizaĝon kaj la pupilojn ĉielen, kaj diris: «ho sanktega Virgulino! Vi, al kiu tiomfoje mi rekomendis min, kaj kiu tiomfoje konsolis min! Vi, kiu suferis tiom da doloroj, kaj nun estas tiel glorata, kaj kiu tiom da mirakloj faris por povraj afliktitoj; helpu min! Liberigu min el tiu ĉi danĝero, rekonduku min savita al mia patrino, ho Patrino de l' Sinjoro; kaj mi al vi faras voton resti virga; mi rezignas por ĉiam al tiu mia povrulo, por dumvive aparteni al neniu krom vi».

Eldirinte ĉi tiujn vortojn, ŝi mallevis la kapon, kaj al si metis la rozarion ĉirkaŭkole, kvazaŭ signon de konsekro, kaj samtempe protektilon, kvazaŭ armaĵon de l' nova armeo, al kiu ŝi aliĝis. Sidiĝinte denove surgrunde, ŝi sentis trankvilon, kaj pli vastan fidon eniri ŝian animon. Ŝi rememoris tiun *morgaŭ matene*, ripetitan de la nekonata potenculo, kaj ŝi

antaŭsentis en tiu vorto promeson de savo. La sensoj, lacaj pro tia batalado, iom post iom dormetiĝis en tia kvietiĝo de pensoj; kaj fine, jam proksime al tagiĝo, kun la nomo de sia protektantino stumpa surlipe, Lucia ekdormis je dormo perfekta kaj kontinua.

Sed estis ankaŭ alia homo, en tiu sama kastelo, kiu volus ekdormi, kaj tute neniam sukcesis. La senjoro, foririnte, aŭ preskaŭ forkurinte de Lucia, ordonis por ŝi vespermanĝon, faris kutiman revuon je certaj lokoj de l' kastelo, daŭre kun tiu viva bildo en la menso, kun tiuj vortoj reeĥaj ĉe l' oreloj; poste li rifuĝis en sian ĉambron, kaj tie sin enŝlosis furioz-rapide, kvazaŭ li bezonus ŝirmi sin kontraŭ taĉmento da malamikoj; kaj, senvestiĝinte same rapide, li enlitiĝis. Sed tiu bildo, pli ol iam viva, ŝajnis en tiu momento al li diri: vi ne dormos. – Kia stulta virineca scivolemo min trafis, – li pensis, – por vidi ŝin? Ja pravas tiu bestaĉa Milvo: oni ne plu estas viro; ja fakte, oni ne plu estas viro!... Ĉu mi?... ĉu mi ne plu viro, ĉu mi mem? Kio do okazis? kia diablo min invadis? kio nova estas? Ĉu mi ne jam sciis, ke virinoj plorkrias? Plorkrias eĉ viroj foje, kiam ili ne povas ribeli. Diable! Ĉu mi neniam aŭdis virinojn bleki? –

Ĉe tio, sen ke li farus grandan klopodon, la memoro mem al li prezentis plurajn kazojn, en kiuj nek petegoj nek lamentoj ŝancelis la plenumon de liaj decidoj. Sed la memoro pri tiaj faroj, ne nur ne fortikigis la malkreskantan decidon plenumi la nunan; nek estingis en lia animo tiun ĝenan kompaton; ĝi eĉ vekis en li specon de teruro, ian rabian penton. Tiel ke al li ŝajnis konsole repensi la unuan bildon, nome Lucian, kontraŭ kiun li vane estis klopodinta fortikigi sian kuraĝon. – Ŝi ja vivas, – li pensis, – ŝi estas ĉi tie; mi ankoraŭ havas tempon;

mi povas al ŝi diri: foriru, estu gaja; mi povas vidi tiun vizaĝon ŝanĝiĝi, mi eĉ povas al ŝi diri: pardonu min... Ĉu pardonu min? ĉu mi pardonpeti? ĉu virinon? ĉu mi...! Ha, kaj tamen! se unu vorto, se unu tia vorto povus al mi bonfari, iom forigi de mi ĉi tian diablaĵon, mi eldirus ĝin; he! mi sentas, ke mi ĝin dirus. Jen al kio mi reduktiĝis! Mi ne plu estas viro, ne plu estas viro!... Nu! – li diris poste, kolere turniĝante en la lito jam nun tute malmola, sub la litkovriloj nun ege pezaj: – nu! temas pri stultaĵoj, kiuj jam alifoje pasis tra mia kapo. Forpasos ankaŭ ĉi-tiu. –

Kaj por ĝin forpasigi, lia menso serĉis ian gravan aferon, el tiuj kiuj kutime ĝin intense okupis, por ĝin tute absorbi pri ĝi; sed da tiaĵoj li tute ne trovis. Ĉio aspektis ŝanĝita: tio kio alifoje stimulus plej forte liajn dezirojn, nun havis nenion plu dezirindan; la pasio, kvazaŭ ĉevalo subite timema, ne plu volis avanci. Pensante pri la fi-faroj komencitaj kaj ankoraŭ nefinitaj, anstataŭ ekscitiĝi al ties plenumo, anstataŭ incitiĝi pro l' malhelpoj (ĉar tiumomente eĉ kolero ŝajnus al li dolĉa), li sentis malĝojon, kvazaŭ teruron pro la jam faritaj elpaŝoj. La tempo al li prezentiĝis tute senigita de ĉia celo, de ĉia okupo, de ĉia volo, nur plena de netolereblaj memoroj; ĉiuj horoj similis al la nuna, kiu pasis tiom lanta, tiom peza sur lia kapo. Li revuis en sia menso ĉiujn siajn friponojn, sed li trovis nenion laŭ li gravan por ordoni al kelkiu el ili; eĉ la ideo ilin revidi, troviĝi inter ili, estis nova pezo, naŭza kaj embarasa ideo. Kaj por trovi okupon por morgaŭ, por trovi agon fareblan, li devis pensi, ke morgaŭ li povos lasi tiun povrulinon libera.

– Mi ja liberigos ŝin, jes; tuj ĉe l' tagiĝo, mi rapidos al ŝi, kaj diros: iru, iru. Mi ŝin akompanigos... Kaj kio pri la

promeso? pri la sindevigo? pri Don Rodrigo?... Kiu do estas Don Rodrigo? –

Samkiel homo, kiun surprizis neatendita kaj embarasa demando de superulo, la nenomito tuj pensis, kiel respondi la demandon, kiun al si faris li mem, aŭ pli ĝuste tiu nova *li*, kiu, subite terure kreskinte, leviĝis kvazaŭ por juĝi la malnovan. Li esploris la kialojn, pro kiuj, preskaŭ antaŭ ol esti petita, li sin devontigis suferigi tiom multe, sen malamo, sen timo, malfeliĉan nekonatinon, por servi tiun viron; sed krom ne trovi rezonojn, kiuj tiumomente al li ŝajnus taŭgaj por pravigi la faron, li preskaŭ ne kapablis klarigi al si mem, kial do li decidis tion. Tiu decido, pli ol libera konkludo, estis ekmovo de lia animo obeema al antikvaj, rutinaj sentoj, sekvaĵo de mil antaŭaj faroj; kaj la turmentata ekzamenanto de si mem, por al si klarigi unu faron, troviĝis implikita en la ekzameno de sia tuta vivo. Reen, reen, de jaro al jaro, de puntilio al puntilio, de sango al sango, de krimo al krimo; ĉiu el ili reaperis al lia konscia kaj nova animo sen la sentoj kiuj ĝin voligis kaj plenumigis; ĉiu reaperis kun la monstra malico, kiun tiuj sentoj tiam kaŝis. Ĉiuj apartenis al li, ili estis li mem: la hororo de tiu ĉi penso, kiu reaperis ĉe ĉiu el tiuj bildoj, kaj estis kunligita kun ĉiuj, kreskis ĝis malespero. Li sid-leviĝis rapide, rapide li etendis la manon al la apudlita muro, kaptis pistolon, ĝin dekroĉis, kaj... ĉe l' momento fini vivon ne plu elteneblan, lia penso, atakite per teruro, per tiel dire pluviva malkvieto, impetis en la tempon, kiu tamen plu fluos post lia fino. Li imagis kun hororo sian kadavron deformita, senmova, sub arbitro de l' plej malbrava transvivanto; li imagis la morgaŭan surprizon kaj konfuzon en la kastelo: ĉio renversita; li mem senforta, senvoĉa, ĵetita neniue scias kien. Li imagis la babilojn

farotajn tie, ĉirkaŭe, fore; la ĝojon de siaj malamikoj. Ankaŭ la tenebro, ankaŭ la silento montris en la morto ion pli mizeran, pli teruran; al li ŝajnis, ke li ne hezitus, se tio okazus tage, subĉiele, ĉeeste de ĉiuj: sin ĵeti en riveron kaj malaperi. Kaj, absorbite en ĉi tiaj turmentaj konsideroj, li per la dikfingro konvulsie levis-mallevis la pistolan ellasilon; kiam alia penso trafulmis lian kapon. – Se tiu alia vivo, pri kiu oni al mi parolis, kiam mi estis knabo, pri kiu oni ĉiam parolas, kvazaŭ temus pri ne dubinda afero; se tia vivo tute ne ekzistas, se ĝi estas inventaĵo de l' pastroj; kion mi faras? kial morti? kiom gravas tio kion mi faris? kiom gravas? tio estus frenezaĵo miaflanke... Kaj kio, se male tiu alia vivo ekzistas? –

Ĉe tia dubo, ĉe tia risko, lin kaptis pli nigra, pri peza malespero, el kiu ne eblis eskapi, eĉ ne per la morto. Li delasis la armilon, kaj restis kun la manoj en la haroj, klakigante la dentojn kaj tute tremante. Subite revenis en lian memoron la vortoj aŭditaj kaj reaŭditaj antaŭ kelkaj horoj: – Dio pardonas multe da aferoj, pro unu mizerikorda faro! – Kaj ili revenis ne kun la tono de humila preĝ-peto, kun kiu ili estis diritaj; sed kun aŭtoritata sono, kiu samtempe alportis foran esperon. Ĝi estis momento de konsolo: li disigis la manojn de l' tempioj kaj, kun pli orda teniĝo, li mense rigardis la junulinon dirintan tiujn vortojn; kaj li ŝin vidis, ne kiel lian kaptitinion, ne kiel humilan petantinion, sed kvazaŭ disdonanton de gracoj kaj konsoloj. Li atendis malpacience la tagiĝon, por rapidi liberigi ŝin, kaj aŭdi el ŝia buŝo aliajn konsolajn kaj vivigajn vortojn; kaj li imagis, ke li mem ŝin kondukas al la patrino. – Kaj kio poste? kion mi faros morgaŭ, dum la cetera tago-parto? kion mi faros post-morgaŭ? kaj kion la plipostan tagon? Kaj kio pri la nokto? la nokto kiu revenos post dek du horoj! Ho, la

nokto! ne, ne, la nokto! – Kaj, refalinte en la doloran malplenon de la estonto, li vane serĉis ian tempo-uzon, ian manieron por pasigi la tagojn, la noktojn. Jen li al si proponis forlasi la kastelon, kaj formigri en malproksimajn landojn, kie neniu konos lin, eĉ ne laŭnome; sed li sentis, ke tamen li daŭre restos kun si mem: jen lin rekaptis obskura espero reakiri la iaman spiriton, la iamajn pasiojn; kaj ke la nuna estas nur momenta deliro; jen li timis la tagiĝon, kiu nepre montros lin al liaj subuloj tiel aĉe ŝanĝita; jen li la tagiĝon sopiris, kvazaŭ ĝi devus alporti lumon ankaŭ en liajn pensojn. Kaj ĝuste ĉe l' tagiĝo, kelk-momente post la endormiĝo de Lucia, dum li sidis senmove, jen atingis lian orelon sonora ondo neklare esprimita, kiu tamen kunhavis ion gajan. Li atentis, kaj li rekonis malproksiman festan sonoriladon; kaj post kelke da momentoj, li aŭdis ankaŭ la montaran eĥon, kiu de temp' al tempo ripetis langvore la sonoron, kaj konfuziĝis kun ĝi. Post nemulte, li aŭdas alian pli proksiman sonoriladon, same festo-plenan; pli poste trian. – Kia gajeco estas? kion ĉarma havas ĉiuj ĉi homoj? – Li elsaltis de sia dorna kuŝejo; kaj, duonvestinte sin, li kuris malfermi fenestron, kaj elrigardis. La montojn duon-vualis nebulo; la ĉielo, pli ol nubohava, aspektis kvazaŭ ununura cindro-griza nuboj; sed, ĉe la kreskanta helo, distingiĝis en la val-funda vojo pasantaj homoj, aliaj elirantaj el la domoj, kaj ekirantaj, ĉiuj sandirekten, al la valo-fino, dekstre de l' kastelo, ĉiuj kun festaj vestaĵoj, kaj kun eksterordinara vicleco.

– Kion diablan havas ĉi-homoj? kio estas gaja en ĉi damnita vilaĝo? kien do iras tiu tuta kanajlaro? – Kaj, vokinte fidindan bravulon dormantan en apuda ĉambro, li demandis lin pri la kaŭzo de tiu movado. Li, kiu pri tio sciis same

nenion, respondis, ke tuj li iros informiĝi. La senjoro restis apogite al la fenestro, tute atenta al la moviĝanta spektaklo. Temis pri viroj, virinoj, infanoj, grupe, pare, unuope; unu, atingante alian marŝantan antaŭe, kunmarŝis kun li; alia, elirante el sia domo, kuniĝis kun la unua, en kiun li trafis; kaj ili marŝis kune, kiel amikoj al interkonsentita vojaĝo. La gestoj klare elmontris komunajn urĝon kaj ĝojon; kaj tiu kunsonoro, ne agordita,² sed konkorda, de l' diversaj sonoriloj pli-malpli proksimaj, ŝajnis, se tiel diri, kvazaŭ la voĉo de tiuj gestoj, kaj anstataŭaĵo de la vortoj, kiuj ne povis atingi tien supren. Li rigardis, rigardis; kaj kreskis en lia koro ega scivolo ekkoni, kio do povas komuniki saman fervoron al tiel diversaj homoj.

² *ne agordita*: ne intence harmoniigita.

XXII

Post ne-multe la bravulo venis raporti, ke hieraŭ kardinalo Federigo Borromeo, ĉefepiskopo de Milano, alvenis al ***, kaj tie restos la tutan hodiaŭan tagon; kaj ke la sciigo pri tiu alveno, disvastigite hieraŭ vespere tra l' ĉirkaŭaj vilaĝoj, ĉiujn volontigis iri vidi tiun viron; kaj ke oni sonorigas pro gajeco pli ol por avizi la popolon. La senjoro, restinte sola, plu rigardis la valon eĉ pli mediteme. – Por unu viro! Ĉiuj zorgemaj, ĉiuj gajaj, por vidi unu viron! Kaj tamen ĉiu el ili certe havas sian propran diablön, kiu lin turmentas. Sed certe neniu, tute neniu havas tian, kia la mia; tute neniu pasigis nokton tian, kia la mia! Kion do havas tiu viro, por igi tiom da popolo gaja? Kelke da moneroj eventuale disdonotaj hazardaĉe... Sed ne ĉiuj tien iras por almozo. Nu, kelke da signoj en-aere¹, kelke da vortoj... Ho, se eĉ por mi li havus vortojn, kiuj povas konsoli! se...! Kial ne iras ankaŭ mi? Kial ne?... Mi iros, mi iros; kaj mi volas al li paroli: tute sola mi volas al li paroli. Kion mi diros al li? Nu, tion kio, tion kio... Mi aŭdos, kion li mem, tiu viro, havas por diri! –

Alpreninte tiel konfuze tiun ĉi decidon, li rapide finvestis sin, surmetante soldateskan jaketon; li prenis la pistolon restintan surlite, kaj kroĉis ĝin al la zono ĉe unu flanko; kaj ĉe la alia duan, kiun li dekroĉis el najlego de la muro; en tiun saman zonon li metis ponardon; kaj dekroĉinte de l' muro karabenon preskaŭ same faman kiel li mem, li surmetis ĝin traŝultre; li prenis la ĉapelon, eliris de l' ĉambro; kaj antaŭ ĉio li iris tien, kie li estis lasinta Lucia-n. Li demetis la karabenon ekstere, en anguleton apud la pordo, kaj li frapetis, aŭdigante samtempe sian voĉon. La oldulino ellitiĝis unu-salte, kaj kuris

¹ *signoj en-aere*: kristanaj kruco-gestoj, por beni.

malfermi. La senjoro eniris, kaj rigardinte la ĉambron, li ekvidis Lucia-n kuntirita kaj kvieta en ŝia anguleto.

«Ĉu ŝi dormas?» li demandis mallaŭte al la oldulino: «ĉu tie ŝi dormas? Ĉu tion ĉi mi ordonis, plej kanajla?».

«Mi ĉion klopodis», ŝi respondis: «sed ŝi neniam volis manĝi, neniam volis veni...».

«Lasu ŝin dormi pace; vi tute evitu ĝeni ŝin; kaj kiam ŝi vekigĝos... Marta venos en ĉi-apudan ĉambron; kaj vi ŝin sendos preni kion ajn ŝi eventuale petos de vi. Kiam ŝi vekigĝos... al ŝi diru ke mi... ke la mastro foriris por ne-longa tempo, kaj li revenos, kaj ke... li faros kion ajn ŝi volos».

La oldulino estis tute mirigita, pensante en si mem: – Ĉu eble ŝi estas princino? –

La senjoro eliris, reprenis sian karabenon, sendis Marta-n kiel antaŭ-ĉambraninon, sendis la unuan renkontitan bravulon kiel gardostaranton, por ke neniu, krom tiu virino, enpaŝu en la ĉambron; kaj poste li eliris de la kastelo, kaj komencis desupri, kurante.

La manuskripto ne diras, kiom distancis la kastelo de la vilaĝo, kie estis la kardinalo; sed el la rakonto de la okazaĵoj oni povas konjekti, ke ĝi ne estis pli ol longa promenado. Por tion konjektigi, ne sufiĉus la alveno de la valanoj, kaj ankaŭ de homoj pli foraj; ĉar en la tiutempaj kronikoj ni trovas, ke eĉ de dudek mejloj kaj pli multe oni venis amase, por vidi Federigon.

La bravuloj, kiuj sur la deklivo hazarde trafis lin, ekhaltis respekto-plene ĉe l' paso de l' senjoro, atendente, ĉu eventuale li havas ordonojn por doni, aŭ li intencas ilin kun si konduki, por ia ekspedicio; kaj ili ne sciis, kion pensi pri lia mieno, kaj pri la okulumoj, kiujn li turnis, responde al iliaj kliniĝoj.

Kiam li atingis la publikan vojon, la pasantoj miregis, vidante lin sen eskorto. Cetere ĉiu lasis al li spacon, vaste flankiĝante kiom sufiĉus ankaŭ por la eskorto, kaj senĉapeligis sin respekteme. Atinginte la vilaĝon, li trovis grandan popolamason; sed lia nomo tuj kuris de buŝo al buŝo; kaj la amaso fendiĝis. Li proksimiĝis al iu, kaj lin demandis, kie estas la kardinalo. «En la domo de l' parokestro», li respondis kliniĝante, kaj li indikis, kie ĝi situas. La senjoro iris tien, eniris korteton, kien estis amasiĝintaj multe da pastroj, kiuj ĉiuj rigardis lin kun mirega kaj suspektema atento. Fronte li vidis tute malfermitan pordon, kiu kondukis en saloneton, kien multe da aliaj pastroj estis kunvenintaj. Li deprenis la karabenon, kaj demetis ĝin en angulon de l' korteto; poste li eniris la saloneton: kaj ankaŭ tie okulumoj, flustroj, ripetata nomo, kaj silento. Turninte sin al unu el ili, li demandis, kie estas la kardinalo; aldonante ke li volas kun li paroli.

«Mi estas fremda ĉi tie», respondis la demandito, kaj ĉirkaŭ-rigardinte, li vokis la kapelanon kruc-portiston, kiu ĝuste tiumomente estis diranta al najbara kunpastro: «ĉu li mem? tiu famulo? kion havas tiu viro por fari ĉi tie? for de li!». Sed ĉe tiu voko, kiu sonis distinge tra ĉies silento, li devis veni; li sin klinis antaŭ la nenomito, aŭskultis, kion li volas, kaj levante kun malkvieta scivolo la okulojn al tiu vizaĝo, kaj tuj mallevante ilin, li hezitis momente, poste li diris aŭ balbutis: «mi ne scias, ĉu la eminentega monsinjora moŝto... en tiu ĉi momento... troviĝas... estas... povas... Sufiĉe, mi iras vidi». Kaj malvolonte li iris transdoni la mesaĝon en la apudan ĉambron, kie sidis la kardinalo.

Je tiu ĉi punkto de nia historio, ni ne povas ne halti iomete, kiel vojaĝanto, kiu, laca kaj malgaja el longa marŝado

tra seka kaj sovaĝa tereno, ekhaltas kaj restas iom da tempo ĉe l' ombro de bela arbo, sur herbo, apud fonto de viva akvo. Ni trafis en personon, kies nomo kaj memoro, aperante al la menso, ĉiufoje refreŝigas ĝin per kvieta emocio el respekto kaj per ĝoja sento el simpatio; des pli nun, post tiom da ĉagrenaj bildoj, post kontemplo de multobla kaj ĝenaĉa malico! Pri tiu ĉi persono ni nepre bezonas malŝpari kelke da vortoj: kiu ne ŝatus ilin aŭdi, kaj tamen emus daŭrigi pri la historio, tiu transiru senpere al la sekva ĉapitro.

Federigo Borromeo, naskita en la 1564-a jaro, estis unu el la homoj, raraj ĉiuepoke, kiuj aplikis sian eminentan genion, ĉiujn rimedojn de siaj grandaj riĉaĵoj, ĉiujn avantaĝojn de privilegia rango, sian daŭran intencon, por celi kaj praktiki tion, kio estas plej bona. Lia vivo estas kiel torento, kiu, fontinte kristal-pura el roko, neniam stagna nek malklara, tra longa vojo sur diversaj grundoj iras tute pura sin ĵeti en riveron. Ek de sia infan-aĝo, inter komfortoj kaj pompoj, li konsideris tiujn evangeliajn vortojn pri abnegacio² kaj humileco, tiujn maksimumojn pri vanteco de l' voluptoj, pri maljusteco de l' orgojlo, pri la vera digno kaj la veraj bonoj: maksimumojn kiujn, ĉu sincerajn aŭ ne-sincerajn en la koroj, oni tradicias de generacio al generacio en la plej elementa religia instruado. Li do tiujn vortojn konsideris, serioze ilin pripensis, gustumis ilin, trovis ilin veraj; li vidis ke do ne povas veri aliaj, malaj vortoj kaj maksimumoj, kiujn oni same tradicias de generacio al generacio, kun sama sekureco, kaj foje el samaj lipoj; kaj li decidis preni kiel normon de siaj faroj kaj pensoj ĝuste tiujn, kiuj konsistigas la veron. Konvinkite, ke la vivo ne estas destinita esti pezo por multaj kaj festo por kelkaj, sed por

² *abnegacio*: virta rezigno de komfortaĵoj kaj plezuroj.

ĉiuj tasko, pri kiu ĉiu respondecos, li ek de sia infan-aĝo komencis pripensi, kiel igi sian vivon utila kaj sankta.

En la 1580-a jaro li esprimis la rezolutan decidon sin dediĉi al la eklezia servo, kaj la surveston de ekleziula robo li ricevis el la manoj de sia kuzo Karlo,³ kiun famo jam longtempa kaj universala proklamis sanktulo. Post ne-multe li eniris la kolegion, fonditan de Karlo mem en Pavia, kiu ankoraŭ havas ilian familian nomon. Tie, krom konstante plenumi la taskojn, kiujn li trovis preskribitaj, li sin devigis al du kromaj: instrui la kristanan doktrinon al la plej krudaj kaj forlasitaj el la popolo, kaj viziti, servi, konsoli kaj helpi malsanulojn.

En tiu loko ĉio donis al li prestiĝon. Li ĝin eluzis, logante siajn kamaradojn sekvi lin en tiaj faroj; kaj en ĉiu honesta kaj utila afero li havis kvazaŭ modelan superecon: superecon, por kiu verŝajne sufiĉus liaj personaj ecoj, eĉ se li estus el plej modesta rango. Li ne nur ne serĉis, sed eĉ faris ĉian klopodon, por eviti alispecajn avantaĝojn, kiujn lia rango povus al li doni. Li volis manĝo-tablon pli malriĉa ol sobra, li uzis vestaĵaron pli malriĉan ol simplan; kaj li konformigis al tio sian tutan viv-nivelon kaj sintenon. Kaj neniam li taksis, ke li devas tion ŝanĝi, kvankam kelke el liaj parencoj kriis kaj plendis, ke tiele li mallevas la dignon de la domo. Alian bataladon li devis fari kun la edukistoj, kiuj, kaŝe kaj kvazaŭ surprize, strebis meti antaŭ, aŭ sur, aŭ ĉirkaŭ li, pli senjorecan ornamaĵon aŭ ilon, kiu distingus lin el la ceteraj, kaj

³ *Karlo*: Sankta Karlo Borromeo, kuzo de Federigo kaj lia antaŭulo kiel kardinalo ĉefepiskopo de Milano, jam dumvive ĝuis famon de sanktulo, kaj estis oficiale sankt-proklamita en 1610.

aspektigus lin loka princo: ĉu opiniante ke per tio ili al si altiros lian ŝaton, ĉu ĉar ilin instigis tia ekscesa servemo, kiu pufiĝas kaj refreŝiĝas per alies pompo; ĉu ĉar ili apartenis al tiaj prudentuloj, kiujn ĝenas kaj virtoj kaj malvirtoj, kaj daŭre predikas, ke perfekteco kuŝas meze; kaj la mezon ili fiksas ĝuste tie, kien ili mem atingis, kaj kie ili sidas komforte. Federigo ne nur ne cedis al tiuj provoj, sed eĉ riproĉis la provantojn. Tio okazis inter liaj puberiĝo kaj junaĝo.

Tute ne estas mirinde ke, kiam ankoraŭ vivis kardinalo Karlo, dudek ses jarojn pli aĝa ol li, la infanaĝa kaj la juna Federigo, fronte al ties digna kaj solena aspekto, kiu tiel vive esprimis sanktecon, kaj montris ties praktikon, kaj al kiu, se bezone, ĉiumomente aldonis prestiĝon la malkaŝa kaj spontana devoteco de l' ĉirkaŭstarantoj, kiaj kaj kiom ajn ili estis, strebis konformiĝi al la sinteno kaj al la penso-maniero de tia superulo. Sed estas notinde ke, eĉ post ties morto, neniu povis rimarki ke al Federigo, tiam dudek-jara, mankas gvidanto kaj cenzuranto. La kreskanta famo pri liaj talento, klereco kaj pieco, la parenceco kaj la klopodoj de pli ol unu potenca kardinalo, la prestiĝo de lia familio, la nomo mem, al kiu Karlo preskaŭ alligis en la mensoj ideon pri sankteco kaj eminenteco: ĉio, kio devas kaj povas konduki al altaj ekleziaj rangoj, kontribuis por ilin al li prognozigiti. Sed li, konvinkite elkore pri afero, kiun neniu sin deklaranta kristano malkonfesas parole: nome, ke neniam homo rajtas rangi super la aliaj krom por ilin servi, efektive timis altajn rangojn, kaj klopodis ilin eviti; tute ne por eviti servojn; ĉar malmulte da homoj vivis tiel servo-pretaj kiel li; sed ĉar li sin taksis nek inda nek taŭga por tiom alta kaj danĝera servo. Tial, kiam papo Klemento la 8-a en la jaro 1595-a al li proponis la

ĉefepiskopecon de Milano, li montriĝis tre maltrankvila, kaj senhezite rifuzis. Pli poste li cedis al la eksplicita papa ordono.

Tiaj elmontoj de modesteco, kiu tion malscias? estas nek malfacilaj nek maloftaj; kaj la hipokriteco ne bezonas grandan klopodon por ilin esprimi, nek la burleskeco por ilin ĉiuokaze primoki. Sed, ĉu ili ne plu povas esti sincera esprimo de virta kaj saĝa sento? Vivo vortojn testas: kaj la vortoj esprimantaj tiun senton, eĉ se ilin jam eldiris la buŝoj de ĉiaj hipokrituloj kaj burleskuloj, ĉiam estos belaj, kiam ilin antaŭas kaj sekvas sen-profita kaj sinofera vivo.

Evidentiĝis en ĉefepiskopo Federigo speciala kaj daŭra klopodo al si rezervi, el riĉaĵoj, el tempo, el zorgoj, entute el si mem, nur kiom strikte necesas. Li diris, kiel ĉiuj diras, ke la ekleziaj rentoj estas posedaĵo de l' malriĉuloj: kiel efektive li tiun ĉi principon konceptis, oni vidu el jeno. Li ordonis taksi kiom kostas vivteni lin kaj lian servistaron; kaj ĉar oni al li diris, ke temas pri ses cent eskudoj (eskudo nomiĝis tiuepoke la or-monero, kiu, gardante samajn pezon kaj titron, estis pli poste nomita zekino), li ordonis tiun sumon ĉerpi el lia privata kaso; opiniante ke li, riĉega, ne rajtas vivi el eklezia havaĵo. Koncerne siajn personajn posedaĵojn, li estis tiel rigore ŝparema kaj domaĝema, ke li zorgis ne demeti vestaĵon antaŭ ties konsumiĝo: kunigante tamen, kiel tiamaj historiistoj rimarkis, la zorgon por simpleco kun tiu por fajna pureco: du kutimoj rimarkindaj, en tiu epoko malpuraĉa kaj luksopompa. Simile, por ke nenio perdiĝu el la restaĵoj de lia sobra tablo, li destinis ilin al malriĉulejo; kaj unu el tiuj malriĉuloj lia-ordone eniris ĉiutage lian manĝejon, por kolekti eventualajn restaĵojn. Zorgoj, kiuj povus pensigi pri virto pedanta kaj

spirite malvasta, ne-taŭga por altaj projektoj; se ne starus tiu ĉi⁴ Ambroza biblioteko, kiun Federigo elpensis kun tiel aŭdaca grandiozeco, kaj elfundamente konstruis per tiom da elspezoj. Por ĝin provizi per libroj kaj manuskriptoj, krom donaco de tiuj, kiujn li jam kolektis per grandaj zorgo kaj elspezoj, li dissendis ok virojn, el kiel eble plej kleraj kaj spertaj, por akapari da ili tra Italujo, Francujo, Hispanujo, Germanujo, Flandrujo, kaj eĉ en Grekujon, en Libanon, al Jerusalemo. Tiele li sukcesis kolekti ĉirkaŭ tridek mil presitajn volumojn, kaj dek kvar mil manuskriptojn. Al la biblioteko li alligis kolecion el doktoroj (ili estis naŭ, de li mem honorariate, dum li vivis; poste, ĉar ne sufiĉis la ordinaraĵoj, oni reduktis ilin al du); kaj ilia tasko estis kulturi diversajn studojn: teologion, historion, literaturon, ekleziajn antikvaĵojn, orientajn lingvojn; ĉiu kun la devo publikigi verkojn pri la fako al li komisiita; li aldonis duan kolecion, kiun li nomis trilingva, por studado de la greka, latina kaj itala lingvoj; kaj kolecion da studentoj instruataj pri tiuj fakoj kaj lingvoj, por ke ili fariĝu siatempe instruantoj; li aldonis presejon de orientaj lingvoj, tio estas hebrea, kaldea, araba, persa kaj armena; unu galerion de pentraĵoj, unu de skulptaĵoj, kaj lernejon pri la tri ĉefaj figuraj artoj⁵. Por ĉi-lastaj, li sukcesis trovi jam forĝitajn profesorojn; por la cetero, ni jam vidis kiom li penadis, por kolekti librojn kaj manuskriptojn; certe pli malfacilis trovi la preslitterojn de lingvoj tiutempe en Eŭropo ege malpli kulturataj ol nuntempe; kaj eĉ pli malfacile trovi fakulojn ol liter-tipojn. Sufiĉos diri ke, el naŭ doktoroj, li elprenis ok el la junaj studentoj de la pastro-seminario; kaj el

⁴tiu ĉi: t.e. en Milano.

⁵ la tri ĉefaj figuraj artoj: pentrado, skulptarto kaj arkitekturo.

tio eblas konkludi, kian konsideron li havis pri sia-epokaj studo-niveloj kaj reputacioj: konsideron laŭ-ŝajne konforman al tiu de la posteularo, kiu unujn kaj aliajn tute forgesis. En la reguloj, kiujn li fiksas por uzo kaj mastrumo de la biblioteko, oni travidas intencon de ĉiama utilo, ne nur bonan en si mem, sed plur-flanke saĝan kaj noblan, super la ideoj kaj komunaj kutimoj de tiu epoko. Li preskribis al la bibliotekestro korespondadi kun la homoj plej kleraj en Eŭropo, por ricevi sciigojn pri la stato de la sciencoj, kaj avizojn pri la plej bonaj eldonitaj libroj en ĉiuj fakoj, kaj ilin aĉeti; li al tiu preskribis konatigi al la kleruloj la librojn, kiujn ili eventuale ne konis, aŭ kiuj povus al ili utili; li ordonis disponigi al ĉiuj, ĉu civitanoj ĉu fremduloj, eblecon kaj tempon por ilin konsulti, laŭ-bezone. Ĉi tiu intenco nuntempe ŝajnas memkomprenebla, kaj identigita kun la celo mem de biblioteko; sed tiuepoke la afero ne stasis tiele. Kaj en historio de la Ambroza biblioteko, verkita (kun la stilo kaj eleganteco kutimaj en tiu jarcento) de Pierpaolo Bosca, kiu bibliotekestrin post la morto de Federigo, estas eksplicite notite kiel nekutima afero, ke en tiu ĉi biblioteko, starigita de privatulo preskaŭ tute lia-elspeze, la libroj estas eksponitaj al la publiko, donataj al ĉiaj petantoj, al kiuj oni havigas ankaŭ sid-lokon, kaj paperon, plumojn kaj inkujon por eventuale bezonataj notoj; dum en aliaj eminentaj italaj publikaj bibliotekoj, la libroj estis eĉ ne videblaj, sed fermitaj en ŝrankoj, el kiuj oni ne ilin deprenis, krom pro bonvolo de la bibliotekistoj, kiam ili taksis oportune ilin montri momente; sed oni eĉ ne imagis disponigi al la vizitantoj la oportunon studi. Tiel ke, provizi bibliotekojn signifis depreni librojn el la komuna uzo: unu el tiaj kultivaĵoj, kiuj ekzistis kaj ankoraŭ nuntempe abundas, kiuj steriligas la

kampon.

Ne demandu, kia estis la influo en la publikan kulturon de tiu ĉi fondaĵo de Borromeo: estus facile demonstri per du frazoj – kiel oni kutimas demonstri – ke la fruktoj estis miraklaj, aŭ neniaj; esplori kaj iel klarigi, kiaj efektive ili estis, estus afero tre peniga, ne tre utila, kaj ne oportuna. Sed vi pensu, kia malavara, kia prudenta, kia bonvola, kia persista amanto de l' homa progreso nepre estis la homo, kiu tiun establaĵon volis, kaj volis ĝin tia, kaj ĝin efektivigis, meze de tiaj ĝeneralaj malklereco, inerteco, malfavoro koncerne ĉian inteligentan iniciaton, kaj konsekvence meze de ripetaj *kio interesas?* kaj *kial ne elpensi alion?* kaj *kia bela eltrovaĵo!* kaj *eĉ tion oni bezonis!*, kaj similaj onidiroj, kiuj tutcerte plimultis ol la eskudoj elspezitaj por tiu entrepreno: kiuj estis cent kvin mil, plejparte el lia persona kaso.

Por difini tian viron eminenta bonfara kaj malavara, verŝajne ne necesas ekscii, ĉu li elspezis multe da aliaj eskudoj ankaŭ por senpera helpo al bezonantoj; kaj eble iuj ankoraŭ opinias, ke tiuj elspezoj, kaj mi aŭdacas diri, ĉiaj elspezoj⁶ estas ĉiuokaze plej bona kaj utila almozo. Sed Federigo taksis la striktasencan almozon sia ĉefdevo; kaj ĉe tio, kiel ĉe l' ceteraj aferoj, liaj faroj estis koheraj kun lia opinio. Lia tuta vivo estis senĉesa disdonado al malriĉuloj; kaj koncerne la malsategon, pri kiu jam traktis nia historio, ni havos post nemulte la oportunon raporti detalojn, el kiuj oni vidos kiajn prudenton kaj noblecon li kapablis apliki ankaŭ en tiu ĉi donacemo. Ni citos ĉi tie nur unu el la multaj mirindaj ekzemploj, kiujn notis liaj biografiistoj pri tia virto. Sciinte, ke

⁶ *ĉiaj elspezoj*: laŭ ekonomikistoj samepokaj de Manzoni, ĉiu ajn elspezo, pliigante la mon-cirkuladon, fakte bonfaras al la socio.

nobelo aplikis artifikojn kaj trudojn por monakinigi filinon, kiu male preferus edziniĝi, li venigis la patron; kaj lin konfesiginte, ke la vera motivo de tio estas malhavo de kvarmil eskudoj, lia opinie necesaj por edzinigi konvene la filinon, Federigo ŝin dotis per kvarmil eskudoj. Tia ĉi donacemo eble ŝajnos al oni tro granda, ne tute prudenta, tro cedema al la stultaj kapricoj de malmolestulo; kaj ke monsumon el kvarmil eskudoj oni povus uzi pli bone en cent aliaj manieroj. Al tio ni havas nenion por respondi, krom ke estus dezirinde vidi oftajn ekscesojn de virto tiel libera el regantaj opinioj (ĉiu epoko havas la siajn), tiel ne-dependa de la ĝenerala tendenco, kiel, ĉi-kaze, la virto, kiu instigis homon doni kvarmil eskudojn, por eviti kontraŭvolan monakinigon de junulino.

La neelĉerpebla karitato de ĉi-viro brilis en lia tuta trakto-maniero, ne malpli ol en lia donacemo. Facile alirebla por ĉiuj, li kredis, ke speciale al tiuj, kiujn oni nomas sen-rangaj, li ŝuldas gajan mienon, amo-plenan afablecon; des pli multe, ju malpli da ĝi ili trovas en la mondo. Kaj ankaŭ ĉi-rilate li devis batali kun la honestuloj de *ne quid nimis*⁷, kiuj ĉiuokaze volus lin restigi interne de la ĝustaj limoj, tio estas iliaj limoj. Iam okazis ke, unu el tiaj honestuloj, kiam Federigo, vizitante alt-montaran, krudan vilaĝon, instruis malriĉajn infanojn, kaj, ilin pridemandante kaj instruante, amoplene ilin karesis, avertis la kardinalon, ke li evitu ilin karesi, ĉar tro malpuraĉaj kaj naŭzaj: kvazaŭ la honestulo supozus, ke Federigo mem ne havas sufiĉe da sentumo por tion malkovri, aŭ ne sufiĉe da

⁷ *ne quid nimis*: latine = nenia troigo: antikva maksimumo, kiu emfazas ke la virto estas meza inter du ekscesoj; sed foje, pretekste de la “ora mezo”, oni filistre indiferentas al altaj, noblaj idealoj.

sagaco, por eltrovi tiom fajnan rimedon. Tia ĉi estas, en certaj momentoj kaj situacioj, la malfeliĉo de l' homoj establitaj alt-range: ke dum tre malofte ili trovas avertantojn pri iliaj kulpoj, aliflanke ne mankas aŭdacantoj riproĉi pro iliaj bonfaroj. Sed la bonkora episkopo, ne sen kolereto, respondis: «ili estas miaj animoj, kaj eble ili ne plu vidos mian vizaĝon; kaj vi volus ke mi ne ilin brakumu?».

Tamen tute malofte estis kolero en li, admire pro l' mildeco de liaj manieroj, pro l' senperturba trankvilo, kiun oni atribuas al eksterordinare feliĉa temperamento, sed kiu fakte estis frukto de konstanta disciplino super sia viva kaj incitiĝema karaktero. Se li foje montris sin severa, kaj eĉ akra, tio koncernis liajn spiritajn subpaŝtistojn, se li eventuale malkovris ilin kulpaj pro avareco aŭ malzorgemo, aŭ aliaj moralaj makuloj speciale opoziciaj al la spirito de ilia nobla misio. Sed rilate lian personan profiton aŭ surteran gloron, li tute neniam esprimis ĝojon aŭ bedaŭron, aŭ ardon, aŭ eksciton: mirinde, se tiaj sentoj ne vekiĝis en lia koro, eĉ pli mirinde se ili vekiĝis. El la multaj konklavoj, kiujn li partoprenis, li ne nur akiris famon, ke li neniam aspiris al tiu rango, tiom dezirinda por la ambicio, kaj tiom timinda⁸ por la pieco; sed iufoje, kiam tre prestiĝa kolego venis por al li proponi sian voĉdonon kaj tiun de sia partio (malbela vorto, sed ĝin oni uzis), Federigo rifuzis la proponon tiamaniere, ke tiu kardinalo rezignis tiun intencon, kaj sin turnis aliflanken. Tia ĉi sama modesteco, tia ĉi malinklino superregi manifestiĝis ankaŭ en pli ordinaraj okazoj de la vivo. Vigla kaj senlaca dispozicii kaj regi tie, kie li taksis tion sia devo, li ĉiam evitis entrudi sin en alies aferojn; eĉ petite, li laŭpove

⁸ *timinda*: pro la respondeco kiun papeco kunhavas.

klopodis eviti enmiksiĝon: diskreteco kaj sindeteno ne komunaj, kiel konate, en homoj fervoraj pri bonagoj, kia estis Federigo.

Se ni volus ĝui la plezuron kolekti la rimarkindajn ecojn de lia karaktero, certe rezultus unika konsistaĵo el meritoj ŝajne opoziciaj, kaj certe malfacile kunmeteblaj. Tamen ni ne neglektos rimarki alian kuriozaĵon de tiu bela vivo: kiu, tiel plena de aktivadoj, regado, Di-servoj, instruado, aŭdiencoj, diocezaj vizitoj, vojaĝoj, kontraŭstaroj, tamen por studado li dediĉis ne nur parteton, sed tiom, kiom sufiĉus eĉ por profesia klerulo. Kaj fakte, krom tiom multaj kaj diversaj laŭdindaĵoj, Federigo havis eĉ l' samtempuloj ankaŭ famon de klerulo.

Tamen ni ne rajtas malŝajnigi, ke li tenis kun firma konvinko, kaj subtenis praktike, kun longa persisto, opiniojn, kiuj nuntempe ŝajnas al ĉiuj pli strangaj ol senfundamentaj⁹: eĉ al dezirantoj trovi ilin pravaj. Kiu volus por li pledi ĉi-teme, tiu trovus eble la komunan kaj akceptatan senkulpigon, ke temis pri eraroj liaepokaj, pli ol liapersonaj. Tia senkulpigo povus valori iomete, aŭ eĉ multe, koncerne difinitajn temojn, se tio rezultus el detala esploro de la faktoj; sed, aplikite senkondiĉe kaj blinde, kiel oni kutime faras, ĝi estas tute sensenca. Kaj tial, ne volante solvi per simplaj formuloj komplikajn demandojn, nek tro longigi la ekskurson, ni evitos eĉ prezenti ilin; ĉar al ni sufiĉas aludeti preterpase ke, koncerne viron ĝenerale tiel mirindan, ni ne lin pretendas tia ĉiuflanke; por ke ne ŝajnu, ke ni intencis komponi funebran oracion.

⁹ *senfundamentaj*: Manzoni, edukite laŭ klerisma kulturo, miras ke kardinalo Federigo kredis, same kiel liaj samtempuloj, ke la peston kaŭzis sorĉistinoj aŭ ŝmiristoj.

Certe ne ofendas niajn legantojn supozi, ke kelke el ili demandas, ĉu tiu ĉi viro ne postlasis dokumentojn pri tiom da talento kaj tiom da studado. Tute jes! Ĉirkaŭ cent estas la verkoj de li postlasitaj, inter grandaj kaj etaj, latinaj kaj itallingvaj, presitaj kaj manskribaj. Ili estas gardataj en la biblioteko de li fondita: traktatoj pri moralo, oracioj, disertacioj pri historio, pri religiaj kaj profanaj antikvaĵoj, pri literaturo, pri artoj, kaj alie.

– Kial do, eble diros tiu leganto, tiom da verkoj estas forgesitaj, aŭ almenaŭ tiel malmulte konataj kaj esplorataj? Kial do, ĉe tiom da talento, tiom da studado, tiom da sperto pri homoj kaj aferoj, ĉe tiom da meditado, tiom da fervoro por bono kaj belo, ĉe tiom kristalpura animo, tiom da aliaj ecoj, kiuj konsistigas grandan verkiston, li, el cent faritaj verkoj, postlasis eĉ ne unu el tiuj kiuj estas taksataj eminentaj eĉ de la homo, kiu ne tute aprobas ilin, kaj titole konataj eĉ de l' homo, kiu ne legas ilin? Kial do lia tuta verkaro ne sufiĉis, almenaŭ per sia kvanto, por havigi al lia nomo literaturan famon ĉe ni, la posteuloj? –

La demando estas sendube prava, kaj la problemo tre interesa; ĉar, observante multe da ĝeneralaj faktoj, oni trovas la kaŭzojn de tiu ĉi fenomeno; kaj trovite, ĉi-lastaj kondukus al klarigo de pluraj aliaj similaj fenomenoj. Sed ili estus multnombraj kaj tede longaj: kaj kio, se ili ne plaĉus al vi? Se ili al vi kuntirigus la nazon? Tiel ke preferindos, ke ni daŭrigu la fadenon de la historio, kaj, anstataŭ pli longe babili pri tiu ĉi viro, ni iru, gvidate de nia aŭtoro, vidi lin aganta.

XXIII

Kardinalo Federigo, dum li atendis la momenton eniri la preĝejon por Di-servi, estis studanta, kiel li kutimis dum ĉiuj liberaj temp-eroj; kiam eniris la kapelano kruc-portisto kun ekscitita mieno.

«Stranga vizito, vere stranga, monsinjoro eminentega!». «Kiu estas?» demandis la kardinalo.

«Eĉ eĉ senjoro...» reparolis la kapelano: kaj, dis-silabante kun granda emfazo, li elparolis tiun nomon, kiun ni ne povas skribi por niaj legantoj. Poste li aldonis: «li mem staras ĉi-ekstere; kaj li eĉ petas esti enkondukita ĉe vian eminentegan moŝton».

«Ĉu li!» diris la kardinalo, kun vigla vizaĝo, fermante la libron, kaj leviĝante el-side: «li venu! li venu tuj!».

«Sed...» replikis senmove la kapelano: «via eminentega moŝto nepre sciu, kiu do li estas: tiu bandito, tiu famulo...».

«Kaj ĉu ne estas feliĉo por episkopo, ke en tia homo estiĝis la volo fari al li viziton?».

«Sed...» insistis la kapelano: «ni neniam rajtas paroli pri certaj aferoj, ĉar monsinjoro diras, ke estas babiloj: tamen, ĉe-kaze, al mi ŝajnas, ke estas devo... Fervoro estigas malamikojn, monsinjoro; kaj ni pozitive scias, ke pli ol unu fripono aŭdacis fanfaroni, ke iam aŭ tiam...».

«Kaj kion ili faris?» interrompis la kardinalo.

«Mi diras ke tiu ĉi viro estas komisiulo de krimoj, malesperulo, en rilatoj kun plej furiozaj malesperuloj, kaj ke li povus esti sendita...».

«Ho, kia disciplino estas tio ĉi», interrompis denove Federigo, ridetante, «ke soldatoj instigas generalon al malbraveco?». Poste, fariĝinte serioza kaj enpena, li daŭrigis:

«sankta Karlo tute ne debatus, ĉu akcepti tian viron: li mem irus serĉi lin. Enkonduku lin tuj: li jam tro longe atendis».

La kapelano ekiris, dirante en si mem: – Estas senrimede: ĉiuj ĉi sanktuloj estas obstinaj –.

Malferminte la pordon, kaj enirinte la ĉambron, kie staris la senjoro kaj la pastroj, li vidis ĉi-lastajn amasiĝintaj aparten, flustrante kaj kaŝrigardante tiun viron forlasitan sola en angulo. Li sin direktis al li; kaj laŭ-pove esplorante lin flank-rigarde, li konjektadis, kia diabla armilaro povas kaŝiĝi sub tiu jakego: kaj ke vere, antaŭ ol lin enkonduki, li devus al li proponi, almenaŭ... sed li ne aŭdacis tion decidi. Li proksimiĝis al li, kaj diris: «la monsinjoro atendas vian moŝton. Degnu veni kun mi». Kaj antaŭirante tra tiu homamaso, kiu tuj formis spaliron, li turnis dekstren kaj malen okulumojn, kiuj signifis: kion fari? ĉu vi mem ne scias, ke li ĉiam agas laŭ sia bontrovo?

Apenaŭ la nenomito estis enkondukita, Federigo iris al li renkonten, kun afabla kaj serena mieno, kun malfermitaj brakoj, kvazaŭ al atendata homo, kaj tuj gestis al la kapelano, ke li eliru: ĉi-lasta obeis.

La du restintoj estadis iom da tempo senparolaj, kaj divers-maniere suspensaj. La nenomito, tien kvazaŭ perforte alportite de ne-klarigebla pasio, pli ol kondukite de difinita intenco, tie ankaŭ restis kvazaŭ perforte, dis-tirate de du malaj pasioj: unuflanke la deziro kaj konfuza espero trovi rimedon al sia interna turmento, aliflanke kolero kaj honto, ke li venas kvazaŭ pentinto, kvazaŭ subigito, kvazaŭ mizerulo, por sin konfesi kulpa, por fari petegon al homa estulo: kaj li ne trovis, kaj preskaŭ eĉ ne serĉis vortojn. Sed levante la okulojn al la vizaĝo de tiu viro, li sentis sin pli kaj pli penetrata de impona

kaj samtempe dolĉa respektego, kiu, plifirmigante la fidemon, mildigis la iritiĝon, kaj, ne front-atakante la orgojlon, ĝin tamen faligis, kaj, mi diru, silentigis.

Fakte la aspekto de Federigo apartenis al tiaj, kiuj sentigas superecon kaj igas ĝin aminda. Lia sinteno estis nature digna, kaj preskaŭ senvole majesta, tute ne kurba nek malvigla malgraŭ la aĝo; la okulo gravmiena kaj viva, la frunto serena kaj enpena; kun blankaj haroj, en lia paleco, inter signoj de abstinenco, de meditado, de penado, speco de virgeca florado: ĉiuj trajtoj montris, ke iam sur ĝi estis tio, kio propra-sence nomiĝas beleco; la kutime solenaj kaj bonvolaj pensoj, la dumviva interna paco, la hom-amo, la kontinua ĝojo pro nedirebla espero ĝin anstataŭigis, mi preskaŭ dirus, per maljunaĝa beleco, kiu eĉ pli multe elstaris en la brila simpleco de l' purpuro¹.

Ankaŭ li mem fiksis kelkmomente al la vizaĝo de l' nenomito sian penetreman rigardon, de-longe spertan diveni el la mienoj la pensojn; kaj, ĉar sub tiu obskuro kaj maltrankvilo, li pli kaj pli divenis ion similan al tio, kion li ek-esperis ĉe la anonco de tiu vizito, tute vigle, «Ho!» li diris: «kia valora vizito! kaj kian dankon mi al vi ŝuldas pro tia bona decido; kvankam ĝi estas al mi iom riproĉa!».

«Ĉu riproĉa!» elkriis la senjoro, mirigite, sed mildigite de tiuj vortoj kaj tiu trakto-maniero, kaj kontenta ke la kardinalo ĉesigis la silento-glacion kaj komencis ajnan konversacion.

«Certe, estas al mi riproĉe», li reparolis, «ke mi lasis vin mem anticipi; kiam jam tiom longe kaj tiomfoje mi mem devus veni al vi».

«Ĉu vi mem, al mi? Ĉu vi scias, kiu mi estas? Ĉu oni diris

¹ *purpuro*: la kardinala robo estas purpur-kolora.

al vi klare mian nomon?».

«Kaj ĉu vi supozas, ke tian ĉi konsolon, kiun mi nun sentas, kaj kiu certe al vi manifestiĝas el mia aspekto, mi travivus ĉe l' anonco, ĉe l' vido de nekonato? Vi mem sentigas ĝin al mi; vi, mi ripetas, kiun mi mem jam devus serĉi; vi, kiun mi ĉiuokaze tiel multe amis kaj priploris, por kiu mi tiel multe preĝis; vi, kiun, inter miaj filoj, ĉiuj de mi elkore amataj, mi pleje estus dezirinta akcepti kaj brakumi, se mi kredus, ke mi povas tion esperi. Sed Dio, Li sola, potencas fari mirindaĵojn, kaj riparas la malfortikecon, la pigrecon de siaj povraj servantoj».

La nenomito staris mirigite ĉe tiel fervora diro, ĉe tiuj vortoj, kiuj tiel kohere respondis al tio, kion li ankoraŭ ne diris, nek jam tute decidis, ĉu li diros; kaj, kortuŝite sed konsternite, li silentis. «Kio do?» reparolis eĉ pli ameme Federigo: «vi havas bonan novaĵon por al mi komuniki, kaj ĉu tiom longe vi igas min sopiri ĝin?».

«Ĉu mi, bonan novaĵon? Mi havas inferon enkore; kaj ĉu mi donus al vi bonan novaĵon? Vi mem diru al mi, se vi scias, kio do estas la bona novaĵo, kiun vi atendas de homo kia mi».

«Ke Dio tuŝis vian koron, kaj volas ke vi apartenu al li», respondis kviete la kardinalo.

«Dio! Dio! Dio! Se mi vidus lin! Se mi aŭdus lin! Kie do estas tiu Dio?».

«Ĉu vi pridemandas min? ĉu vi mem? Kaj kiu do havas lin pli proksima ol vi mem? Ĉu vi ne sentas enkore, ke li vin premas, vin skuas, ne lasas vin kvieta, kaj samtempe vin logas, al vi sentigas esperon pri paco, pri konsolo: konsolo, kiu estos plena, senmezura, tuj kiam vi lin agnoskos, lin konfesos, lin preĝegos?».

«Ho, certe! mi havas ion ĉi tie, kio min premas, min ronĝas! Sed Dio! Se tiu Dio ekzistas, se li estas tia, kia oni lin diras, kion vi supozas, ke li faros el mi?».

Ĉi-vortoj estis eldiritaj kun malespera emfazo; sed Federigo respondis, kun tono solena, kaj kvazaŭ serene inspirita: «kion povas fari Dio el vi? kion li volas fari? Fari vin signo de sia potenco kaj bonkoreco: li volas eltiri el vi gloron, kian neniu alia povus al li havigi. Tio, ke la mondo jam longe kriadas kontraŭ vin, ke mil kaj mil voĉoj abomenas viajn farojn...» (la nenomito skuiĝis kaj momente miris, aŭdante tiun nekutiman lingvaĵon, kaj eĉ pli multe, ke li ne sentas indignon, sed eĉ preskaŭ konsolon); «kia gloro», daŭrigis Federigo, «el tio devenas al Dio? Estas voĉoj de teruro, voĉoj de intereso; eble eĉ voĉoj de justeco, sed de justeco tiel facila, tiel terana! eble eĉ voĉoj de envio, bedaŭrinde, pri ĉi via misfeliĉa potenco, pri via ĝis nun mallaŭdinda anim-sekureco. Sed kiam vi mem leviĝos por kondamni vian vivon, por kulpigi vin mem, ho tiam! tiam Dio estos glorata! Kaj ĉu vi demandas, kion Dio povus fari el vi? Kio do estas mi, povra homo, por al vi antaŭdiri ek de nun, kian profiton povus eltiri el vi tia Di-Sinjoro? kion li povus fari el via impeta volo, el ĉi tia senŝancela persistemo, kiam li mem ĝin animus, flamigus per amo, per espero, per pento? Kio do estas vi, povra homo, por kredi, ke vi povis per vi mem kaj elpensi kaj efektiviĝi farojn pli grandajn en malbono, ol kiajn Dio povus al vi voligi kaj efektiviĝi en bono? Kion do povas fari Dio el vi? Kaj pardonu vin? kaj vin savi? kaj en vi plenumi la elaĉeton? Ĉu ili ne estas faroj grandiozaj kaj indaj je Li? Ho pripensu! se mi, malŝatinda hometo, mi, mizeraĉa, kaj tamen tiom plena je orgojlo, se mi, kia mi estas, tiel konsumiĝas nun por via spirita

savo, ke por ĝi mi oferus ĝojoplene (Dio al mi estu atestanto) ĉi malmultajn vivo-tagojn, kiuj al mi restas; ho pripensu! kia kaj kiom granda nepre estas la amo de Tiu, kiu al mi donas ĉi mian amon tiom neperfektan, sed tiom vivan; pripensu kiel amas kaj sopiras vin Tiu, kiu al mi ordonas kaj inspiras por vi la amon, kiu min konsumas!».

Laŭgrade kiel tiuj ĉi vortoj eliris el liaj lipoj, la vizaĝo, la rigardo, ĉiu movo elradiis ties sencon. La vizaĝo de lia aŭskultanto, el konsterna kaj konvulsia, unue fariĝis miro-plena kaj tute atenta; poste ĝi mieniĝis al pli profunda kaj malpli angora emocio; liaj okuloj, kiuj ek de infan-aĝo ne plu konis larmojn, ŝvelis; kaj kiam la vortoj jam ĉesis, li al si kovris la vizaĝon per la manoj, kaj eksplodis je plorego, kiu estis kvazaŭ lia lasta kaj plej klara respondo.

«Dio granda kaj bona!» elkriis Federigo, levante la okulojn kaj la manojn al la ĉielo: «kion do faris mi, senutila servisto, dormema paŝtisto, por ke Vi invitu min al tiu ĉi graco-festeno, por ke vi igu min inda ĉeesti tiun ĉi ĝojindan miraklon!». Tion dirante, li etendis la manon, por preni tiun de la nenomito.

«Ne!» ekkriis ĉi-lastata, «ne! for, restu for de mi: ne malpurigu tiun senkulpan kaj bonfaran manon. Vi ne scias ĉion, kion faris tiu ĉi, kiun vi volas premi».

«Lasu», diris Federigo, kaptante ĝin kun amema perforto, «lasu, ke mi premu ĉi-vian manon, kiu riparos tiom da maljustaĵoj, kiu disdonos tiom da bonfaroj, levos tiom da afliktitoj, kiu sin etendos senarmila, paca kaj humila, al tiom da malamikoj».

«Tio troas!» diris, singultante, la nenomito. «Lasu min, monsinjoro; bonkora Federigo, lasu min. Amasa popolo

atendas vin; tiom da bonaj animoj, tiom da senkulpuloj, tiom da venintoj de malproksime, por vidi vin unufoje, por aŭskulti vin: kaj vi restadas... kun kiu do!». «Ni forlasu la naŭdek naŭ ŝafojn²», respondis la kardinalo: ili estas sekuraj surmonte: mi volas resti kun tiu, kiu estis perdiĝinta. Eble tiuj animoj ĝojas eĉ pli multe, ol vidante ĉi tiun povran episkopon. Eble Dio, kiu faris en vi miraklon de mizerikordo, dismetas en ilin ĝojon, kies motivon ili ankoraŭ ne konscias. Eble tiu popolo estas senkonscie kuneca kun ni: eble la Sankta Spirito metas en iliajn korojn nekularan karitatan ardon, preĝadon kiun Li elaŭdas viafavore, dankesprimon, kies ankoraŭ nekonata objekto estas vi mem». Tion dirante, li etendis la brakojn al la kolo de la nenomito; kiu, post momenta provo rezisti, cedis, kvazaŭ venkite per tiu impeto de amo, ĉirkaŭbrakis siavice la kardinalon, kaj delasis sur lian ŝultron sian tremantan kaj ŝanĝitan vizaĝon. Liaj ardaj larmoj falis sur la senmakulan purpuron de Federigo; kaj la senkulpaj manoj de ĉi-lastaj brakumis amoplene tiujn membrojn, premis tiun jakegon, kutiman surporti la armilojn de perforto kaj perfido.

La nenomito, liberigante sin el tiu brakumo, al si kovris denove la okulojn per mano, kaj levante samtempe la vizaĝon, elkriis: «Dio vere granda! Dio vere bona! nun mi konas min mem, mi komprenas, kiu do mi estas; miaj pekoj staras antaŭ mi; mi abomenas min mem; kaj tamen...! kaj tamen mi sentas konsolon, mi sentas ĝojon, jes tian ĝojon, neniam de mi sentitan dum mia tuta horora vivo!».

«Ĝi estas specimeno», diris Federigo, «kiun Dio al vi donas, por vin allogi al lia servo, por vin instigi eniri rezolute

² *naŭdek naŭ ŝafojn*: laŭ la Evangelio, bonkora paŝtisto ilin forlasas, por serĉi la centan, kiu erarperdiĝis.

novan vivon, en kiu vi havos multe por malfari, multe por ripari, multe por priplori!».

«Ho mi malfeliĉa!» elkriis la senjoro, «kiom, kiom da... aferoj, kiujn mi povos nur priplori! Sed almenaŭ mi havas aliajn nur entreprenitajn, apenaŭ komencitajn, kiujn mi povas rompi: unu aferon mi havas, kiun mi povas tuj rompi, malfari, ripari».

Federigo ekatentis; kaj la nenomito rakontis mallonge, sed per vortoj de abomeno eĉ pli akraj ol tiuj de ni uzitaj, la trudegon faritan al Lucia, la terurojn, la suferojn de la povrulino, kaj kiel ŝi petegis, kaj la ekscitegon, kiun tiu preĝpetado enmetis en lin, kaj kiel ŝi ankoraŭ estas en la kastelo...

«Ha, ni ne perdu tempon!» elkriis Federigo, anhela el kompatato kaj zorgemo. «Beatas vi! Tio ĉi estas garantiaĵo de la pardono de Dio! Igi vin instrumento de savo por tiu, al kiu vi intencis esti kaŭzo de pereco. Dio benu vin! Dio benis vin! Ĉu vi scias, el kiu loko estas ĉi nia kompatinda afliktitino?».

La senjoro nomis la vilaĝon de Lucia.

«Ĝi ne estas for de ĉi tie», diris la kardinalo: «laŭdata estu Dio; kaj verŝajne...». Tion dirante, li rapidis al tablo, kaj svingis tintilon. Kaj tuj eniris anxie la kapelano kruc-portisto, kiu unue rigardis la nenomiton; kaj vidinte tiun vizaĝon ŝanĝita, kaj tiujn okulojn larmo-ruĝaj, li rigardis la kardinalon; kaj, rimarkante en lia vizaĝo, sub ties senperturba teniĝo, dignan kontenton kaj malpaciencon kaj zorgon, li restus tie ekstaze gapa, se la kardinalo ne tuj lin vekus el tiu kontemplo, lin demandante, ĉu inter la tien kunvenintaj parokestroj ĉeestas ankaŭ tiu de ***.

«Li ĉeestas, eminentega monsinjoro», respondis la

kapelano.

«Tuj venigu lin», diris Federigo, «kaj kun li la ĉi-tiean parokestron».

La kapelano eliris, kaj eniris la ĉambron kie estis la kunvenintaj pastroj: ĉies okuloj sin turnis al li. Li, plu gapante, kun la vizaĝo ankoraŭ ekstaza, levante la manojn, kaj movante ilin en-aere, diris: «sinjoroj! sinjoroj! *haec mutatio dexteræ Excelsi*³». Kaj li restis momente, nenion alian dirante. Poste, reakirinte sian ofican tonon, li aldonis: «Lia eminentega kaj respektindega moŝto volas sinjoron parokestron de ĉi tiu paroko, kaj sinjoron parokestron de ***».

La unua vokito tuj sin prezentis, kaj samtempe el la amaso eliris ia «ĉu mi?», trene eldirata, kun miroplena intonacio.

«Ĉu vi ne estas la sinjoro parokestro de ***?» reparolis la kapelano.

«Ĝuste; sed...».

«Lia eminentega kaj respektindega moŝto volas vin».

«Min?» diris ankoraŭ tiu voĉo, kiu per tiu unu silabo klare signifis: kiel povus mi mem koncerniĝi? Sed ĉi-foje, kune kun la voĉo eliris la viro, Don Abbondio mem, kun pena paŝado, kun mieno inter mirplena kaj naŭzita. La kapelano al li faris per la mano geston, kiu signifis: estas nia vico; ni do iru; ĉu tiom malfacile? Kaj antaŭ la du parokestroj li iris al la pordo, malfermis ĝin, kaj enkondukis ilin.

La kardinalo lasis la manon de l' nenomito, kun kiu intertempe li jam interkonsentis, kion fari; li iom disiĝis, kaj per gesto li venigis la parokestron de la loka preĝejo. Li diris

³ *haec... Excelsi*: latine = Tiun ĉi ŝanĝon faris la dekstra de l' Plejaltulo.

al li resume, pri kio do temas; kaj ĉu li povas tuj trovi bonan virinon, dispanan veturi brankarde al la kastelo, por akompani Lucia-n: sed virinon bonkoran kaj saĝkapan, kapablan elturniĝi ĉe tiel nekutima ekspedicio, kaj uzi plej taŭgajn manierojn, por kuraĝigi, por trankviligi tiun povrulinon, al kiu, post tiom da angoroj, kaj en tiel granda perturbo, eĉ la liberiĝo povus enmeti novan konfuzon. Pripensinte momente, la parokestro diris, ke li havas taŭgan personon, kaj li eliris. La kardinalo venigis per alia gesto la kapelanon, al kiu li ordonis tuj disponigi brankardon kaj brankardistojn, kaj seladon de du mulinoj. Post kiam ankaŭ la kapelano eliris, li sin turnis al Don Abbondio.

Ĉi lasta, kiu jam estis al li proksima, por sin teni for de tiu alia senjoro, kaj dume subrigardis jen unu jen la alian, daŭre cerbumante en si mem, kion do povas signifi tiu tuta manovrado, pli-proksimiĝis, faris riverencon, kaj diris: «oni al mi komunikis, ke via eminentega moŝto volas min mem; sed mi kredas, ke estis eraro».

«Ne estis eraro», respondis Federigo: «mi havas bonan novaĵon, por al vi doni, kaj konsolan, dolĉegan taskon. Unu el viaj paroĉaninoj, kiun vi certe priploris perdita, Lucia Mondella, estas retrovita, estas ĉi-proksime, hejme de ĉi mia kara amiko; kaj nun vi iros kun li, kaj kun la virino, kiun la sinjoro parokestro de ĉi tiu loko iris serĉi, vi iros, mi ripetas, preni tiun filinon vian, kaj vi ŝin akompanos ĉi tien.

Don Abbondio faris ĉian klopodon, por kaŝi la ĝenon, kion mi diras? la angoron kaj amarecon, kiun tia propono, aŭ eble ordono, al li kaŭzis; kaj ĉar estis tro malfrue por forviŝi kaj glatigi la grimacon aperintan sur lia vizaĝo, li kaŝis ĝin, klinante profunde la kapon, kiel signon de obeo. Kaj li levis

ĝin, nur por fari alian profundan riverencon al la nenomito, kun kompto-veka rigardo, kiu signifis: mi estas en viaj manoj: kompton: *parcere subjectis*⁴.

Poste la kardinalo demandis lin, kiujn parencojn Lucia havas.

«El proksimaj parencoj, kun ŝi vivantaj aŭ vivintaj, ŝi havas nur la patrinon», respondis Don Abbondio.

«Kaj ĉu ŝi troviĝas en sia vilaĝo?».

«Jes, monsinjoro».

«Ĉar», reparolis Federigo, «tiu povra junulino ne povos tiel baldaŭ reveni hejmen, estos al ŝi tre konsole tuj revidi la patrinon: do, se la sinjoro parokestro ĉi-tiea ne revenos antaŭ mia eniro en la preĝejon, vi faru al mi la komplezon diri al li, ke li trovu kaleŝon aŭ rajd-beston; kaj li sendu prudentan viron serĉi tiun virinon, por konduki ŝin ĉi tien».

«Kaj kio, se irus mi mem?» diris Don Abbondio.

«Ne, ne vi: mi jam petis vin por alio», respondis la kardinalo.

«Tion mi diris», replikis Don Abbondio, «por prepari tiun povran patrinon. Ŝi estas tre sentema virino; kaj necesas homo konanta ŝin kaj kapabla trakti ŝin laŭ ŝia temperamento, por ne fari al ŝi malbonon anstataŭ bonon».

«Ĝuste pro tio mi petas vin avizi sinjoron parokestron, ke li elektu taŭgan viron: vi estas multe pli necesa aliloke», respondis la kardinalo. Kaj li volus aldoni: tiu povra junulino pli multe bezonas vidi konatan vizaĝon, fidindan personon, en tiu kastelo, post multhora suferego, kaj en terura nescio pri la estonto. Sed tio ne estis klare dirinda antaŭ tiu tria ĉeestanto. Sed al la kardinalo ŝajnis strange, ke Don Abbondio ne kaptis

⁴ *parcere subjectis*: latine = indulgi subiĝintojn.

ĝin enaere, aŭ eĉ ne elpensis ĝin per si mem; kaj la propono kaj insisto de Don Abbondio ŝajnis al li tiel maloportunaj, ke li pensis ke certe io subestas. Li rigardis lian vizaĝon, kaj li facile malkovris la timon vojaĝi kun tiu terura viro, eniri ties domon, eĉ nur kelk-momente. Volante do tute forigi tiujn kovardajn⁵ ombrojn, kaj ne ŝatante apartigi la pastron kaj kun li flustri sekrete, ĉeeste de lia nova amiko, li ekpensis ke plej oportune estas fari tion, kion li farus eĉ sen tiu ĉi motivo: paroli al la nenomito mem; kaj el ties respondoj Don Abbondio fine komprenos ke li ne plu estas timinda. Tial li proksimiĝis al la nenomito, kaj kun la teniĝo de spontana fidemo, konstatebla ĉu en nova kaj forta am-sento, ĉu en malnova intimeco, «vi ne kredu», li diris al li, «ke mi kontentiĝas per ĉi hodiaŭa vizito. Vi revenos, ĉu ne? kune kun ĉi tiu bonvirta ekleziulo, ĉu?».

«Ĉu mi revenos?» respondis la nenomito: «eĉ se vi malakceptus min, mi restadus obstine ĉe via pordo, kiel almozulo. Mi bezonas paroli al vi! mi bezonas aŭdi vin, vidi vin! mi bezonas vin!».

Federigo kaptis lian manon, premis ĝin, kaj diris: «vi do komplezos resti por tagmanĝi kun ni. Mi atendas vin. Dume, mi iras preĝi, kaj dank-esprimi kun la popolo; kaj vi iros rikolti la unuajn fruktojn de l' mizerikordo».

Don Abbondio, ĉe tiaj esprimoj, staris kiel timema knabo, kiu vidas homon karesi sekure sian grandan, taŭzitan, ruĝ-okulan hundaĉon, kun nomo famaĉa pro mordoj kaj teruroj, kaj aŭdas la mastron diri, ke temas pri bona bestego, tute kvieta: la knabo rigardas la mastron, kaj ne kontraŭdiras nek aprobas; rigardas la hundon kaj ne aŭdacas proksimiĝi,

⁵ kovardajn = timoplenajn, malbravajn.

timante ke la bona bestego montros al li la dentojn, eble nur por ĝoj-flati; ne aŭdacas foriĝi, por ne atentigi; kaj diras en sia koro: ho, se mi estus hejme!

La kardinalo, ekforiris, plu man-kondukante la nenomiton, kiam li denove rimarkis la povrulon restinta malantaŭe, humiligita, malkontenta, senvole paŭta. Kaj pensante, ke eble tia ĉagreno al li venas el tio, ke li sin sentas neglektata, kaj preskaŭ flank-lasita, des pli kompare kun krimulo tiel akceptata kaj karesata, li sin turnis al li, ekhaltis momente, kaj kun amo-plena rideto al li diris: «sinjoro pastro, vi ĉiam estas kun mi en la domo de nia bona Patro; sed ĉi tiu... ĉi tiu *perierat, et inventus est*⁶.

«Ho kiom mi gratulas!» diris Don Abbondio, farante riverencon al ambaŭ kune.

La ĉefepiskopo pluiris, puŝis la pordon, kiun de ekstere tuj malfermegis du servistoj starantaj du-flanke: kaj la mirinda paro aperis al la tute scivolaj okuloj de la pastraro kunveninta en la salono. Oni vidis tiujn du vizaĝojn, sur kiuj estis pentrita diversa, sed same profunda emocio; dankema tenereco, humila ĝojo en la respektinda aspekto de Federigo; en tiu de la nenomito, konfuzo mildigita per konsolo, nova pudoro, kontricio, tra kiu tamen ankoraŭ vidiĝis la energio de tiu sovaĝa kaj ofend-senta temperamento. Pli poste sciiĝis, ke pli ol unu el la rigardantoj rememoris la Biblian diron de Jesajo: *lupo kaj ŝafido paŝtiĝos kune; leono kaj bovo manĝos kune pajlon*. Post ili venis Don Abbondio, kiun neniu priatentis.

Kiam ili atingis la mezon de la salono, eniris aliflanke la ĉambrohelpanto de l' kardinalo, kaj al li proksimiĝis, por al li

⁶ *perierat, et inventus est*: latinaj vortoj el la Evangelio = estis perdita kaj troviĝis.

diri, ke li plenumis la ordonojn al li komunikitajn de la kapelano; ke la fermita portlito kaj la du mulinoj estas pretaj, kaj oni nur atendas la virinon, kiun la parokestro alkondukos. La kardinalo al li diris, ke tuj kiam alvenos la parokestro, ĉi-lasta parolu kun Don Abbondio: kaj poste ĉio estu sub komando de ĉi-lasta kaj de l' nenomito; al kiu li premis denove la manon por forsaluto, dirante: «mi atendas vin». Li sin turnis por saluti Don Abbondion, kaj sin direktis al la preĝejo. La pastraro lin sekvis, duon-amase kaj duon-procesie. La du kunvojaĝontoj restis solaj en la ĉambro.

La nenomito staris tute absorbita, enpena, atendente malpacience la momenton liberigi el angoroj kaj karcero sian Lucia-n: nun sian tute ali-sence ol hieraŭ: kaj lia vizaĝo esprimis profundan eksciton, kiu al la suspektema okulo de Don Abbondio facile ŝajnis io pli aĉa. Li subrigardis lin, kaj volus kun li startigi amikecan konversacion; sed, – kion al li diri? – li pensis: – ĉu mi diru ankoraŭ: mi gratulas? Mi gratulas pri kio? ke, estinte ĝis nun demono, vi fine decidis fariĝi honestulo kiel ceteraj homoj? Ja bela komplimento! He he he! kiel ajn mi manipulus la gratulojn, nur tion ili signifus. Se tamen veras, ke li fariĝis honestulo: tiel subite! Ja multajn afektojn oni faras en la mondo, kaj pro multe da motivoj! Kion mi scias, ĉu eventuale... Kaj dume mi devas iri kun li! en tiun kastelon! Ho kia historio! kia historio! kia historio! Se oni tion al mi prognozus ĉi-matene! Ha, se mi sukcesos el-saviĝi, grandan riproĉegon miaflanke devos aŭdi sinjorino Perpetua, ke ŝi perforte pelis min ĉi tien, kiam tio ne necesis, ekster mia teritorio: kaj ke ĉiuj ĉirkaŭaj parokestroj kunvenas, eĉ el pli fore; kaj ke oni ne devas postresti; kaj ĉi tio kaj alio; kaj enmiksi min en ĉi-specan aferon! Ho ve al mi! Kaj tamen ion

ajn oni devas diri al ĉi-homo. – Post longa cerbumado, li eltrovis ke li povus al li diri: tute neniam mi supozis ĉi tian bonŝancon, trafi en tiel respektindan kompanion; kaj li estis malfermonta la buŝon, kiam eniris la ĉambrohelpanto, kun la loka parokestro, kiu anoncis, ke la virino jam pretas en la portlito; kaj poste li sin turnis al Don Abbondio, por ricevi de ĉi-lastata la alian kardinalan komision. Don Abbondio, en tia mensa konfuzo, elturniĝis laŭpove; kaj proksimiĝinte al la helpanto, al li diris: «almenaŭ donu al mi malsovaĝan beston, ĉar verdire mi estas mallerta rajdanto».

«Imagu», respondis la helpanto duonridaĉe: «ĝi estas la mulo de l' sekretario, kiu estas literatoro».

«Sufiĉe...» replikis Don Abbondio, kaj li daŭrigis pensante: – bonan ŝancon al mi sendu la Ĉielo –.

La senjoro ĉe l' unua avizo jam rapidis: atinginte la pordon, li rimarkis la post-restintan Don Abbondion. Li ekhaltis por lin atendi; kaj kiam ĉi-lastata alvenis tute haste, kun pardonpeta mieno, li al li sin klinis, kaj antaŭen-irigis lin, kun afabla kaj humila gesto: afero kiu iomete ĝustigis la stomakon de l' povra turmentato. Sed apenaŭ enpaŝinte en la korteton, li vidis alian novaĵon, kiu al li fuŝis tiun etan konsolon; li vidis la nenomiton iri al angulo, preni la karabenon ĉe l' tubo per unu mano, kaj ĉe l' rimeno per la alia, kaj facilmove, kvazaŭ li farus ekzercadon, surmeti ĝin traŝultre.

– Oj! oj! oj! – pensis Don Abbondio: – kion volas fari ĉi-homo per tiu eksplodilo? Ja bela pento-zono, bela pento-skurĝo⁷, trafa por konvertiĝinto! Kaj kio, se en lia kapo zumas grilo? Ho kia ekspedicio! ho kia ekspedicio! –

⁷ *pento-zono... pento-skurĝo*: specialaj zono kaj vipo, per kiuj religiaj homoj sin afliktis pentofare.

Se tiu senjoro povus suspekti, kiaj pensoj trapasas la kapon de lia kunvojaĝanto, ne direblas, kion li farus por lin trankviligi; sed li estis tute for de tia suspekto; Don Abbondio siaflanke tute zorgis eviti ĉian geston, kiu klare signifus: mi ne fidas je via moŝto. Atinginte la ĉe-stratan pordegon, ili trovis la du rajdbestojn pretigitaj: la nenomito salte surrajdis tiun, kiun al li prezentis ĉevalisto.

«Ĉu da miskutimoj ĝi ne havas?» diris Don Abbondio al la ĉambrohelpanto, remetante surteren la piedon jam levitan al la piedingo.

«Surrajdu sentime: ŝafido ĝi estas». Don Abbondio, grimpas surselen, subtenate de la helpanto, supren, supren, supren: jen fine li sidas rajde.

La portlito, kelkpaŝe antaŭe, portate per du mulinoj, ekiris, ĉe ordon-voĉo de la portlitisto; kaj la societo ekvojaĝis.

Oni devis pasi antaŭ la popol-plena preĝejo, tra placeto, ankaŭ ĝi mem plena de alia loka kaj fremda popolo, ne sukcesinta eniri preĝejen. La granda sciigo jam estis diskurinta; kaj ĉe l' apero de la kompanio, ĉe l' apero de tiu viro, objekto, antaŭ nelonge, de teruro kaj abomeno, nun de ĝoja miro, leviĝis el la popolamaso murmuro kvazaŭ aplaŭda; kaj la popolo, fendiĝante, samtempe amasiĝis, por lin vidi proksime. Pasis la portlito, pasis la nenomito kiu, antaŭ la tute malfermita preĝeja pordego, deprenis la ĉapelon, kaj klinis tiun timegatan frunton, ĝis la kol-hararo de la mulino, tra l' flustrado de cent voĉoj dirantaj: Dio benu vin! Ankaŭ Don Abbondio deprenis la ĉapelon, sin klinis, sin rekomendis al la Ĉielo; sed aŭdante la solenan plenvoĉan ĉantadon de l' kunpastroj, li eksentis tiajn envion, malgajan tenerecon kaj korporemon, ke li apenaŭ retenis larmojn.

Pli poste, for de la loĝejoj, en plena kamparo, en la foje senhoma zigzaga vojo, pli nigra vualo etendiĝis super liaj pensoj. Alian objekton, sur kiu fideme fiksi sian rigardon, li ne havis krom la portlitiston, kiu, estante je l' servo de l' kardinalo, supozeble estis bonvirtulo, kaj samtempe ne aspektis malbrava homo. De temp' al tempo aperis vojaĝantoj, eĉ grupoje, alkurantaj vidi la kardinalon; kaj tio estis konsolo por Don Abbondio; sed nur momenta, ĉar oni iris direkte al tiu terurinda valo, kie oni renkontos nur subulojn de la... amiko: kaj kiajn subulojn! Kun la amiko nun li plejmulte deziris startigi konversacion, ĉu por lin esplori, ĉu por gardi lin bonvola; sed vidante lin tiel enpena, ĉia emo pri tio forpasis. Li devis do paroli kun si mem; kaj jen parto de tio kion la povrulo al si diris dum tiu irado: ĉar, se skribi ĉion, tio sufiĉus, por verki tutan libron.

– Vere veras, ke kaj sanktuloj kaj kanajloj havas senbremsan moviĝemon enkorpe, kaj ne kontentiĝas per sia daŭra movo, sed volas kunmovi, se pove, la tutan homaron; kaj ke la plej aktivemaj venas serĉi ĝuste min, kiu serĉas tute nenion, kaj ili venas enmiksi kontraŭvole en siajn aferojn min mem, kiu tute nenion postulas, krom ke oni lasu min vivi! Kia freneza fripono, Don Rodrigo! Kion li malhavas, por esti plej granda feliĉulo en la mondo, se nur li havus apenaŭan prudenton? Riĉa, juna, respektata, flatata: bonstato lin enuigas; kaj li tute devas kolekti malfeliĉojn por si kaj por aliuloj. Li povus praktiki la metion de sinjor' Nenifarulo; tute ne: li volas profesii kiel virin-ĝenulo: kio estas plej freneza, plej raba, plej furioza metio en la mondo; li povus veturi al la paradizo kaleŝe, kaj li preferas atingi la inferon lam-piede. Kaj tiu ĉi ulo!... – Kaj ĉe tio Don Abbondio rigardis lin, kvazaŭ li

suspektus, ke li aŭdas liajn pensojn, – tiu ĉi ulo, renversinte la mondon per siaj misfaroj, nun renversas ĝin per sia konvertiĝo... se ĝi veras. Kaj dume mi mem devas tion eksperimenti!... Estas senrimede: se oni naskiĝis kun tia manio enkorpe, oni nepre devas ĉiam bruegi. Ĉu estus malfacile resti bonmora dumvive, kiel restis mi mem? Tute ne: oni devas dishaki, murdi, diabli... Ho ve al mi!... kaj poste, renversego eĉ por pentofari. Pentofaron, se havi bonan volon, oni povas praktiki hejme, kviete, sen tiom da parado, sen kaŭzi tian ĝenon al proksimulo. Kaj lia kardinala moŝto, tuj-tuj kun malfermitaj brakoj: kara amiko, amiko kara; kaj akcepti ĉion kion li diras, kvazaŭ li estus vidinta lin fari miraklojn; kaj eĉ decidi, kaj enmiksiĝi mane kaj piede: rapide tien, rapide ĉi tien: ĉe mi, tio nomiĝas senpripensa hastemo. Kaj, tute sen ajna garantiaĵo, al li enmanigi povran parokestron! Tio ĉi nomiĝas hazarda lotumado. Sankta episkopo, kia li estas, pri siaj pastroj devus li ĵaluzi, kiel pri l' pupilo de siaj okuloj. Al mi ŝajnas, ke iom da flegmo,⁸ iom da singardo, iom da karitato povus kuniĝi eĉ kun sankteco... Kaj kio, se ĉio estus nur ŝajnigo? Kiu do povas koni ĉiujn intencojn de la homoj? de homoj kia ĉi tiu? Se pensi ke mi estas devigata lin akompani, al lia hejmo! Povus subesti ia diablo: ho ve al mi! estas preferinde ne pripensi ĉi tion. Kaj kio estas ĉi tiu impliko kun Lucia? Ĉu eble okazis akordo kun Don Rodrigo? kiaspecaj uloj! sed almenaŭ la afero estus klara. Sed kiel ŝi venis sub ungegojn de tiu ĉi viro? Kiu do scias? Afero tute sekreta kun monsinjora moŝto: al mi, ĉi-maniere devigita troti, nenion oni diras. Mi ne zorgas ekscii alies aferojn; sed kiam oni mem devas riski sian vivon, oni ankaŭ rajtas ekscii. Se tio necesus,

⁸ *flegmo*: kvieto, indiferenteco, sen-eksciteco.

por rekonduki tiun povrulinon, paciencon! Kvankam li mem povus alkonduki ŝin kun si. Kaj krome, se li tiom konvertiĝis, se li fariĝis sankta patro, kial do oni bezonus min? Ho kia ĥaoso! Sufiĉe; la Ĉielo faru, ke la afero statu ĉi tiel: ĝi estos por mi grava ĝeno, sed paciencon! Mi kontentos ankaŭ pro tiu povra Lucia: supozeble ankaŭ ŝi mem eskapis el gravega riskego; nur la Ĉielo scias, kiom ŝi suferis: mi ŝin kompatas; sed ŝi naskiĝis por mia ruinigo... Se almenaŭ mi povus vidi en la koro de tiu ĉi viro, kiel li pensas. Kiu do povas ekkoni lin? Jen li aspektas kiel sankta Antono en la dezerto; jen kiel Holoferno⁹ mem. Ho ve al mi! ve al mi! Sufiĉe: la Ĉielo havas la devon helpi min, ĉar mi ne enmiksiĝis min mia-kaprice –.

Fakte sur la vizaĝo de l' nenomito oni vidis, se tiel diri, pasi la pensojn, kiel en ŝtorma horo nuboj transkuras antaŭ la suno, alternigante ĉiumomente rabian lumon kaj fridan malhelon. La animo, ankoraŭ tute ebria je l' dolĉaj vortoj de Federigo, kaj kvazaŭ restarigite kaj reunigite je nova vivo, leviĝis al tiuj ideoj pri mizerikordo, pardono kaj amo; poste ĝi refalis sub la pezo de l' terura pasinteco. Li urĝe esploris, kiuj estas la maljustaĵoj ripareblaj, kion oni povas interrompi, kiuj la rimedoj plej taŭgaj kaj plej sekuraj, kiel solvi tiom da nodoj, kion fari el tiom da komplikoj: ĉi-ĉion pripensi kaŭzis konsternegon. Eĉ al tiu ĉi ekspedicio, kvankam plej facila kaj baldaŭ finota, li iris kun malpacienco kaj angoro, pensante ke dume nur Dio scias kiom tiu povrulino suferas, kaj ke li mem, kvankam malpacienca liberigi ŝin, intertempe daŭrigas tiun suferon. Kiam la vojo duiĝis, la brankardisto sin turnis, por ekscii, kiun direkton elekti: la nenomito indikis ĝin per la

⁹ *sankta Antono*: antikva kristana ermito; *Holoferno*: biblia kruela tirano.

mano, samtempe gestante, ke li rapidu.

Ili eniras la valon. Kiel do fartis tiam la povra Don Abbondio! Tiu fama valo, pri kiu li aŭdis rakonti tiom da hororaĵoj; jen li enestas en ĝi: tiuj fifamaj viroj, la kremo de l' bravularo de Italujo, tiuj maltimaj kaj senkompataj viroj; jen li vidas ilin vivaj, li renkontas ilin unuope aŭ duope aŭ triope ĉe ĉiu voj-turniĝo. Ili sin klinis profunde al la senjoro; sed kiaj sun-brunaj vizaĝaĉoj! kiaj hirtaj lipharoj! kiaj okulumaĉoj, kiuj al Don Abbondio ŝajnis signifi: ĉu fordraŝi tian ĉi pastraĉon? Tiagrade ke, ĉe kulmina konsterno, li senvole diris al si mem: – ha, se mi estus ilin geedziginta! pli aĉe ne min trafus. – Dume oni pluiris tra ŝtonoza pado, laŭlonge de la torento: transe, aspraj, malhelaj, senhomaj krutaĵoj; ĉi-flanke, loĝantaro tia, ke ĉia dezerto ŝajnus preferinda: Dante fartis ne pli aĉe meze de l' Misbursaro¹⁰.

Ili pasas antaŭ la Misnokto; bravulaĉoj ĉe-porde, kliniĝoj al la senjoro, okulumoj al lia kunulo kaj al la portlito. Ili ne sciis, kion do pensi: jam estis eksterkutima la matena seneskorta foriro de l' nenomito; kaj ne malpli eksterordinara estis lia reiro. Ĉu predon li kondukis? Kaj kiel li kaptis ĝin per si sola? Kaj kial tiu fremda portlito? Kaj al kiu do povas aparteni tiu livreo? Ili rigardis, rigardis, sed neniu moviĝis, ĉar tion la mastro ordonis per okulumoj.

Ili supreniras la krutaĵon, atingas la kulminon. La bravuloj starantaj sur l' esplanado kaj ĉe-porde, disiras ambaŭflanken, por liberigi la pasejon: la nenomito gestas, ke ili ne plu moviĝu; li spronas, kaj preterpasas la portliton; li gestas al la port-litisto kaj al Don Abbondio, ke ili sekvu lin; li eniras

¹⁰ *Dante... Misbursaro*: plej terura infera regiono, laŭ la poemego «Dia Komedio», de la itala ĉefpoeto *Dante* (1265-1321).

unuan korton, kaj de tiu en duan; li iras direkte al iu pordeto, retenas per gesto bravulon alrapidantan por kapti la piedingon, kaj al li diras: «vi restu tie, kaj neniu venu». Li deseliĝas, alligas rapide la mulinon al fer-krado, iras al la fermita portlito, proksimiĝas al la virino, kiu jam flankenŝovis la kurtenon, kaj al ŝi diras mallaŭte: «vi tuj konsolu ŝin; al ŝi tuj komprenigu, ke ŝi estas libera, en mano de amikoj. Dio rekompencos vin». Kaj li gestas al la brankardisto, ke li malfermu; poste li proksimiĝas al Don Abbondio, kaj, kun serena mieno, kian ĉi-lasta ankoraŭ en li ne vidis, nek supozis ebla: mieno, kiu disradiis ĝojon pro l' baldaŭ plenumota bonfaro, li diras al li plu mallaŭte: «Sinjoro parokestro, mi ne pardon-petas vin pro la ĝeno, kiun mi al vi kaŭzas: vi ja tion faras por Tiu, kiu bone rekompencas, kaj por ĉi tiu povrulino». Tion dirinte, li kaptas per unu mano la mordaĵon, per la alia la piedingon, por helpi Don Abbondion deseliĝi.

Tiu mieno, tiuj vortoj, tiu gesto, vigligis lin. Li eligis suspiron, kiu jam unu horon vagis lia-interne, neniam trovante elirejon; li sin klinis al la nenomito, kaj respondis tute mallaŭte: «ne diru! Ba, ba, ba...!» kaj laŭpove li deglitis de l' rajd-besto. La nenomito alligis ankaŭ ĉi-lastan, kaj ordoninte al la brankardisto resti atende, li elpoŝigis la ŝlosilon, malfermis la pordon, eniris, enkondukis la pastron kaj la virinon, kaj ekiris antaŭ ili direkte al la eta ŝtuparo; kaj la triopo supreniris silente.

XXIV

Lucia estis vekiĝinta antaŭ nemulte; dum parto de tiu tempo ŝi penis por tute rekonsciiĝi, kaj distingi la konfuzajn dormajn viziojn disde la bildoj de tiu realo tro simila al terura halucino de malsanulo. La oldulino tuj proksimiĝis, kaj kun tia voĉo afekte humila, al ŝi diris: «Ha! ĉu vi dormis? Vi povus dormi enlite: mi tion diris al vi ripete hieraŭ vespere». Kaj, ne ricevante respondon, ŝi pludaŭrigis, kun tono de kolereta petego: «manĝu do, kaj prudentu. Hu, kiel vi aspektaĉas! Vi bezonas manĝi. Kaj kio se, revenante, li koleros kun mi?».

«Ne, ne; mi volas foriri, mi volas iri al mia panjo. La mastro tion al mi promesis, li diris: morgaŭ matene. Kie estas la mastro?».

«Li eliris; li diris, ke li revenos baldaŭ, kaj ke li faros ĉion, kion vi volas».

«Ĉu li diris tion? ĉu li diris tion? Kaj do; mi volas iri al mia patrino; tuj-tuj».

Kaj jen aŭdiĝas paŝo-bruo en la apuda ĉambro; poste frapo ĉe l' pordo. La oldulino alkuras, demandas: «kiu estas?».

«Malfermu», respondas mallaŭte la konata voĉo. La oldulino tiras la riglo-stangeton; la nenomito, puŝante malforte la pordo-klapojn, estigas fendeton: li ordonas al la oldulino eliri, kaj enirigas Don Abbondion kun la bonkora virino. Poste li denove fermetas la pordon, kaj restas malantaŭ ĝi, kaj sendas la oldulinon en foran parton de l' kastelaĉo; kiel li jam estis forsendinta la alian virinon, kiu gardo-staris ekstere.

Tia ĉi tuta movado, tiu suspensa momento, la subita apero de novaj personoj, kaŭzis perturbegon en Lucia, al kiu, se la aktuala momento estis netolerebla, ĉia ŝanĝo estis tamen kaŭzo de suspekto kaj nova teruro. Ŝi ekrigardis, ekvidis

pastron, virinon; ŝi iom konsoliĝis: ŝi rigardas pli atente: ĉu estas li? ĉu ne li? Ŝi rekonas Don Abbondion, kaj fiksrigardas, kvazaŭ ensorcĉite. La virino proksimiĝis, kliniĝis super ŝin, kaj rigardante ŝin komplete, prenante ŝiajn manojn, kvazaŭ por karesi kaj samtempe levi ŝin, al ŝi diris: «ho povrulino! venu, venu kun ni».

«Kiu vi estas?» al ŝi demandis Lucia; sed, sen atendi respondon, ŝi sin turnis denove al Don Abbondio, kiu sin detenis du paŝojn pli dise, ankaŭ li mem kun kompatema mieno; ŝi fiksrigardis lin denove, kaj elkriis: «vi! ĉu vi? ĉu sinjoro pastro? Kie ni estas?... Ho ve al mi! Mi estas deliranta!».

«Ne, ne», respondis Don Abbondio: «vere estas mi: vi kuraĝu. Ĉu vi vidas? Ni venis ĉi tien por forkonduki vin. Mi estas ĝuste via parokestro, ĝuste ĉi-cele alveninta ĉi tien, sur rajd-besto...».

Lucia, kvazaŭ reakirinte subite sian tutan forton, ekstaris tut-rapide, poste ŝi denove fiksrigardis tiujn du vizaĝojn, kaj diris: «Do la Madono sendis vin».

«Mi kredas ke jes», diris la bonkora virino.

«Sed ĉu ni povas foriri, ĉu vere ni povas foriri?» reparolis Lucia, mallaŭtigante la voĉon, kaj kun timema kaj suspektema rigardo. «Kaj kio ĉiuj tiuj homoj...?» ŝi daŭrigis kun la lipoj kuntiritaj kaj tremantaj pro teruro kaj hororo: «kaj tiu senjoro...! tiu viro...! Jes ja, li al mi promesis...».

«Ankaŭ li ĉeestas, alveninte kun ni ĝuste por tio, diris Don Abbondio: «li atendas ĉi-ekstere. Ni ekiru rapide; ni ne atendigu tian rangulon».

Tiam la menciito puŝis la pordon, kaj montris sin; Lucia, kiu ĵus deziris lin, eĉ nur lin, pro tio ke ŝi havis surtere nenian

alian esperon; nun, vidinte vizaĝojn kaj aŭdinte voĉojn amikajn, ne sukcesis deteni subitan abomenon; ŝi skuiĝis, retenis la spiron, premiĝis al la bonkora virino, kaj kaŝis la vizaĝon sur ties brusto. La nenomito, ĉe l' vido de tiu vizaĝo, kiun jam hieraŭ vespere li ne sukcesis fiks-rigardi, de tiu vizaĝo nun pli aĉa, pli deprimita, pli anhela pro longa suferado kaj fastado, restis senmova, preskaŭ ĉe-sojle; kaj vidante tian teruriĝon, li mallevis la okulojn, restis ankoraŭ momente senmova kaj senparola; poste, responde al tio, kion la povrulino ne estis dirinta, «estas ja vere», li elkriis: «pardonu min!».

«Li venas, por liberigi vin; li ne plu estas tia; li fariĝis bonkora: ĉu vi aŭdas ke li pardon-petas vin?» flustris la bonkora virino ĉe-orele de Lucia.

«Ĉu oni povus diri plie? Ek, levu tian kapon; ne konduku infane; kaj ni povos foriri baldaŭ», al ŝi diris Don Abbondio. Lucia levis la kapon, rigardis la nenomiton, kaj, vidante tiun frunton klinita, tiun rigardon mallevita kaj konfuza, kaptite de miksita sento el konsolo, dankemo kaj kompatato, ŝi diris: «ho, mia senjoro! Dio vin rekompencu laŭmerite pro via mizerikordo!».

«Kaj al vi centoble pro la bono, kiun al mi faras ĉi-viaj vortoj».

Tion dirinte, li sin turnis, iris al la pordo, kaj eliris unua. Lucia, tute revigliĝinte, lin sekvis kune kun la virino, kiu tenis ŝian brakon; Don Abbondio kiel lasta. Ili desupris tra la ŝtuparo, kaj atingis la pordon kondukantan en la korton. La nenomito malfermegis ĝin, iris al la fermita port-lito, malfermis ties pordeton, kaj kun afableco preskaŭ timema (du ecoj ĉe li novaj) subtenante la brakon de Lucia, li helpis eniri

ĉi-lastan, kaj post ŝi la bonkoran virinon. Pli poste li malligis la mulinon de Don Abbondio, kaj helpis ankaŭ lin mem surrajdi.

«Ho kia degno!» diris ĉi-lasto; kaj li surrajdis multe pli rapide ol unuafoje. La grupeto ekiris, post kiam ankaŭ la nenomito surseliĝis. Lia frunto estis denove levita; kaj lia rigardo reakiris la kutiman ordoneman aspekton. La bravuloj, kiujn li renkontis, divenis sur lia vizaĝo la signojn de forta penso, de eksterordinara zorgo; sed pli multe ili ne komprenis, nek povis kompreni. En la kastelo oni ankoraŭ nenion sciis pri la granda ŝanĝo de tiu viro; kaj certe neniu el ili povus per konjektoj ĝin diveni.

La bonkora virino tuj ferm-ŝovis la kurtenojn; poste amplene preninte la manojn de Lucia, ŝi komencis konsoli ŝin, per vortoj de kompatato, gratulo kaj tenereco. Kaj vidante ke, krom la peno de tiom longa sufero, la konfuzo kaj obskuro pri l' okazintaĵoj malebligis al la kompatinda plenĝui la liberiĝon, ŝi al ŝi diris ĉion, kion ŝi trovis plej taŭga por malimpliki, reordigi, se tiel diri, ŝiajn povrajn pensojn. Ŝi diris al ŝi la nomon de la vilaĝo, al kiu ili estis veturantaj.

«Ĉu?» diris Lucia, kiu sciis, ke ĝi ne foras de ŝia vilaĝo. «Ho sanktega Madono, mi dankas vin. Mia patrino! mia patrino!».

«Ni tuj sendos serĉi ŝin», diris la bonkora virino, ne sciante, ke la afero jam estas farita.

«Jes, jes; kaj Dio rekompencu vin... Kaj vi, kiu vi estas? Kiel vi venis...».

«Min sendis nia parokestro», diris la bonkora virino: «ĉar al tiu ĉi senjoro, Dio (estu li benata!) tuŝis lian koron, kaj li venis al nia vilaĝo, por paroli al sinjoro kardinalo ĉefepiskopo

(tiu sankta viro estas vizitanta nian vilaĝon), kaj li pentis siajn pekaĉojn, kaj li volas ŝanĝi sian vivon; kaj li diris al la kardinalo, ke li forkaptigis povran senkulpulinon, kiu estas vi, akorde kun alia viro sen Dia timo, sed la parokestro al mi ne diris kiu estas tiu viro.

Lucia levis la okulojn al la ĉielo.

«Eble vi tion scias», daŭrigis la bonkora virino: «sufiĉe; sinjoro kardinalo do pensis ke, ĉar temas pri junulino, bezonatas virino por akompani, kaj li ordonis al la parokestro serĉi unu tian; kaj la parokestro bonvole venis al mi...».

«Ho! La Sinjoro vin rekompencu pro via karitato!».

«Kion vi diras, mia povra junulino? Kaj sinjoro parokestro al mi diris, ke mi kuraĝigu vin, kaj mi tuj klopodu konsoli vin, kaj al vi komprenigi ke la Di-Sinjoro vin savis mirakle...».

«Ha jes! vere mirakle; per la propeto de la Madono».

«Do, ke vi estu serena, kaj vi pardonu al via malbonfarinto, kaj vi ĝoju, ke Dio al li mizerikordis, kaj vi eĉ preĝu por li; ĉar, krom spirita merito, vi sentos vian koron malpeziĝi».

Lucia respondis per rigardo, kiu jesis tiom klare, kiom povus fari vortoj, kaj kun dolĉeco, kian neniam vortoj kapablas esprimi.

«Brave, junulino!» reparolis la virino: «kaj ĉar ĉeestis en nia vilaĝo ankaŭ via parokestro (tiom multe da pastroj ĉeestas el la tuta ĉirkaŭaĵo, ke ili povus konsistigi kvar plej solenajn Diservojn), sinjoro kardinalo decidis sendi ankaŭ lin akompane: sed malmulte li helpis. Jam mi aŭdis, ke li estas sentaŭga homo; sed ĉi-okaze mi devis mem konstati, ke li estas pli embarasata ol kokideto en stupo».

«Kaj tiu ĉi viro...» demandis Lucia, «tiu ĉi, kiu fariĝis bonvirta... kiu li estas?».

«Kiel? ĉu vi ne scias?» diris la bonkora virino, kaj ŝi nomis lin.

«Ho mizerikordo!» elkriis Lucia. Kiomfoje ŝi tiun nomon aŭdis ripeti kun horror-sento en pli ol unu historio, ĉiam en la rolo, kiun en aliaj historioj ludas ogro!¹ Kaj nun, ĉe l' penso, ke ŝi estis sub ties terura potenco, ke ŝi estas sub ties kompata gardado; ĉe l' penso pri tiel horora malfeliĉo, kaj tiel subita saviĝo; konsidere, kies do estas tiu vizaĝo, kiun ŝi vidis severa, poste kortuŝita, pli poste humiliĝinta, ŝi restis kvazaŭ ekstaza, nur dirante, de temp' al tempo: «ho mizerikordo!».

«Vere estas granda mizerikordo!» diris la bonkora virino: «tio nepre estos granda konsolo por duona mondo. Se pensi kiom da homoj li tenis tute teruritaj; kaj nun, kiel al mi diris nia parokestro... kaj krome, eĉ nur el la aspekto, oni vidas ke li fariĝis sanktulo! Kaj krome oni tuj vidas la farojn».

Se diri, ke tiu ĉi bonkora virino ne multe scivolis koni iom pli detale la grandan aventuron, en kiu ŝi mem troviĝis rolanta, estus malvere. Sed oni diru ŝiahonore, ke ŝi, regate de respektema kompato por Lucia, iel sentante la gravecon kaj dignon de la tasko al ŝi konfidita, tute ne pensis fari al ŝi maldiskretan aŭ vanan demandon: ĉiuj ŝiaj vortoj, dum tiu tuta vojaĝo, estis nur je konsolo kaj zorgo por la povra junulino.

«Nur Dio scias kiom longe vi fastas!».

«Mi ne plu memoras... estas longtempe».

«Kompatinda! Vi certe bezonas refortikiĝi».

«Jes», respondis Lucia kun malforta voĉo.

«En mia hejmo, dank' al Dio, ni tuj trovos ion. Vi kuraĝu,

¹ ogro: en fabeloj, giganto infan-manĝa.

ĉar ni jam proksimas».

Poste Lucia sin faligis langvora sur la brankardon, kvazaŭ duon-dorma; kaj la bonkora virino ŝin lasis ripozi.

Por Don Abbondio tiu ĉi reveno ne estis tiel angora kiel la ĵusa aliro; kaj tamen ĝi ne estis amuza vojaĝo. Ĉe l' ĉeso de tiu teruraĉo, li komence sentis sin tute senpeza, sed baldaŭ ekaperis en lia koro cent aliaj ĉagrenoj; kiel post elradikigo de granda arbo, la grundo restas libera iomtempe, sed poste ĝi tute kovriĝas per herbaĉoj. Nun li fariĝis pli sentema pri ĉio cetera: ĉu koncerne la nunon, ĉu pri l' estonto, bedaŭrinde al li ne mankis kialoj por turmentiĝi. Nun li sentis, pli multe ol alirante, la malkomforton de tiu vojaĝ-maniero, por li malkutima; kaj tio precipe ĉe l' komenco, descende el la kastelo al la val-fundo. La brankardisto, instigate de la gestoj de l' nenomito, irigis rapidpaŝe siajn ŝarĝo-bestojn; la du rajd-bestoj ilin sekvis egalpaŝe; tiel ke ĉe iuj lokoj plej krutaj, la povra Don Abbondio, kvazaŭ levite de malantaŭe, pendegis antaŭen, kaj, por sin teni, li devis per la mano sin apogi al la sel-arko; tamen li ne aŭdacis peti, ke oni iru malpli rapide, kaj aliflanke li deziris eliri el tiu loko kiel eble plej baldaŭ. Krome, kie la vojo estis sur elstaraĵo aŭ taluso, la mulino, laŭ la moro de siaj similuloj, ŝajnis meti kvazaŭ spiteme la piedojn ĝuste sur la rando; kaj Don Abbondio vidis sub si, preskaŭ vertikale, salt-lokon, aŭ, kiel li pensis, abismon. – Eĉ vi, – li diris en si mem al la besto, – havas tian malbenan emon serĉi riskojn, kiam haveblas tiel vasta pado! – Kaj li tiris la bridon aliflanken; sed vane. Tiel ke, laŭkutime, ronĝante sin pro kolereto kaj timo, li sin lasis konduki laŭ alies plaĉo. La bravuloj al li ne plu kaŭzis tiom da teruro, ĉar nun li sciis pli certe la penson de l' mastro. – Sed, – li tamen pripensis, – se

la sciigo pri tiu ĉi granda konvertiĝo disvastiĝas ĉi interne, dum ni ankoraŭ ĉeestas, kiu do scias, kiel ĝin taksos tiuj ĉi ulaĉoj! Kiu scias, kio do estiĝos! Ĉu eventuale ili imagos, ke mi venis roli kiel misiisto! Ho ve al mi! oni min martirigos! – La serioza aspekto de la nenomito ne ĝenis lin. – Por regi tiajn vizaĝaĉojn, – li pensis, – necesas ne malpli ol tia mieno; ankaŭ mi mem komprenas tion; sed kial ĝuste mi mem devas troviĝi meze de ĉiuj ĉi uloj?»

Sufiĉe; oni fine atingis la fundon de l' krutaĵo, kaj oni ankaŭ eliris de la valo. La frunto de la nenomito pli kaj pli glatiĝis. Ankaŭ Don Abbondio alprenis pli normalan mienon, li iomete eligis la kapon elinter-ŝultre, li malrigidigis la brakojn kaj la gambojn, li rektiĝis, tiel ke li aspektis tute alie; li eligis pli longajn spirojn, kaj kun pli kvieta animo, li komencis konsideri aliajn pli forajn danĝerojn. – Kion do diros tiu bestega Don Rodrigo? Resti tiel seniluzia, kun malgajno kaj moko, imagu, ĉu li ne sentos tion tute amara. Jen nun li ververe diablus. Vidu, ĉu li koleras ankaŭ kontraŭ mi, ĉar mi troviĝas implikita en ĉi tiu historio. Se li tiam aŭdacis sendi tiujn du diablojn, por al mi fari tiun elmontraĉon surstrate, kiu do scias, kion li faros nune? Kontraŭ lian kardinalan moŝton li ne povas elpaŝi, ĉar temas pri eminentulo ege pli granda ol li; tie li devos ronĝi la mordaĵon. Tamen venenon li certe havas en si mem, kaj kontraŭ iun li nepre ellasos ĝin. Kiel do finiĝas aferoj ĉi tiaj? Batoj ĉiam falas suben; kaj ĉifonaĵoj resaltas supren. Lia kardinala moŝto kompreneble zorgos por savi Lucia-n; la alia malfeliĉulo² estas for de man-atingo, kaj krome li jam ricevis sian porcion; jen, mi mem fariĝis la ĉifonaĵo. Estus ja barbare, se, post tiom

² malfeliĉulo: Renzo.

da ĝenaĵoj, post tiom da agitiĝoj, kaj tute senmerite mi mem devus punpagi pro ĉio. Kion do faros nun lia eminentega moŝto por min defendi, post kiam li enmiksiĝis min? Ĉu li povas al mi garantii, ke tiu damnito ne faros kontraŭ mi ian misfaron pli aĉan ol la unuan? Kaj krome, li havas tiom da aferoj enkaŭ! Li entreprenas tiom da agoj! Kiel li povas priatenti ĉion? Tiaj homoj foje lasas la aferojn pli implikitaj ol antaŭe. La bonfarantoj bonfaras maldetale: kiam ili tragustis tian plezuron, ili sentas sin sataj, kaj ne volas plu ĝeniĝi, zorgante pri ĉiuj sekvaĵoj; male la homoj, kiuj plezuriĝas je malbonfaroj, aplikas pli da diligenteco, ili persistas ĝisfine, neniam paŭzas, ĉar tia fiksa ideo ilin ronĝas. Ĉu mi mem iru diri al li, ke mi ĉi tien venis laŭ eksplicita ordono de lia eminentega moŝto, kaj ne laŭ mia iniciato? Tio aspektus, kvazaŭ mi volus partiani por maljusteco. Ho sankta ĉielo! Ĉu mi partiani por maljusteco! Konsidere la feliĉojn, kiujn ĝi al mi donas! Sufiĉe. Konvenos rakonti al Perpetua la aferon, kia ĝi statas; kaj poste lasi al ŝi la taskon disklaĉi ĝin. Kondiĉe ke al monsinjoro kardinalo ne ekzumu la grilo, fari dispublikigon, vanan teatraĵon, kaj enmiksi ankaŭ min mem. Ĉiuokaze, apenaŭ ni alvenos, se li jam eliris de la preĝejo, mi iros lin riverenci tute rapide; se ne, mi komisiros ekskuzi min, kaj tuj-tuj mi iros hejmen. Lucia estas taŭge aranĝita; mi ne plu estas bezonata; kaj post tiom da ĝenoj, mi ja rajtas postuli forripon. Kaj krome... la monsinjoro ne scivolu la tutan historion, kaj mi ne devu doni konton pri la geedziĝo-afero! Ĝi estus kulmina malfeliĉo. Kaj kio, se li vizitos ankaŭ mian parokon!... Ho! Estos kio ajn estos; mi ne volas konfuziĝi antaŭtempe; mi jam havas sufiĉe da malfeliĉoj. Dumtempe mi iras enŝlosi min hejme. Dum la monsinjoro estas en la

ĉirkaŭlokoj, Don Rodrigo ne aŭdacos fari frenezaĵojn. Kaj poste... Kio poste? Ha! Mi vidas ke miajn lastajn jarojn mi devas travivi malfeliĉe! –

La kompanio alvenis, kiam la preĝejaj Diservoj ankoraŭ ne estis finitaj; ĝi pasis meze de la popolamaso, ne malpli kortuŝita ol unuafoje; kaj poste disdividiĝis. La du rajdantoj turniĝis al flanka placeto, ĉe kies fino estis la parokestrejo; la portlito pluveturis direkte al la hejmo de la bonkora virino.

Don Abbondio faris kiel li planis: apenaŭ li deseliĝis, li faris la plej senmezurajn komplimentojn al la nenomito, kaj lin petis bonvole ekskuzi lin ĉe la monsinjoro, ĉar li mem devas senprokraste reveni al sia paroko por urĝaj aferoj. Li serĉis tion, kion li nomis sia ĉevalo, tio estas sian bastonon, de li lasitan en salon-angulo, kaj li ekmarŝis. La nenomito restis atende, ke la kardinalo revenos el la preĝejo.

La bonkora virino, sidiginte Lucia-n en la plej komforta loko de l' kuirejo, klopodadis pretigi ion por ŝin nutri, rifuzante kun ia elkora krudeco la dankesprimojn kaj senkulpigojn, kiujn ĉi-lasta renovigis de temp' al tempo.

Rapide rapide, remetante brulbranĉetojn sub kaldrono, kie naĝis kuirate bongusta kaponio, ŝi pli-boligis la buljonon, kaj pleniginte el ĝi tason, jam provizitan per pan-tranĉaĵoj, ŝi sukcesis fine surtabligi ĝin al Lucia. Kaj vidante la povrulinon revigliĝi ĉe ĉiu kuler-pleno, ŝi laŭt-voĉe gratulis al si mem, ke la afero okazis en tago en kiu, laŭ ŝia esprim-maniero, ne sidis kato en fajrujo. «Hodiaŭ ĉiuj klopodas prepari ion», ŝi aldonis: «escepte de la plej malriĉaj, kiuj penas akiri vician panon aŭ sorgan³ polenton; hodiaŭ tamen el tiom karitata tema senjoro ĉiuj esperas ion ricevi. Ni, dank' al la Ĉielo, ne estas en tia

³ *vician panon aŭ sorgan polenton*: tre malriĉajn vegetajn nutraĵojn.

situacio: el la metio de mia edzo plus io, kio kuŝas sub la suno⁴, oni vivtenas sin. Vi do intertempe manĝu trankvile, ĉar baldaŭ la kapono estos ĝuste kuirita, kaj vi povos refortikiĝi iom pli bone». Tion dirinte, ŝi daŭrigis prepari la tagmanĝon kaj surtabligi ĝin.

Lucia, iom refortiĝinte, dum ŝia animo pli kaj pli kvietiĝis, komencis ordigi sin, laŭ kutimo, laŭ instinkto de persona pureco kaj pudoro: ŝi reordigis kaj fiksitis la lozigitajn kaj taŭzigitajn harplektaĵojn, rearanĝis la tukon sur la brusto kaj ĉirkaŭ la kolo. Tion farante, ŝiaj fingroj trafis en la rozarion, kiun ŝi surmetis pasint-nokte; ŝia rigardo rapidis al ĝi; estiĝis en ŝia menso momenta tumulto; la memoro pri l' voto, ĝis tiam premita kaj sufokita sub tiom da aktualaj sentoj, subite revekiĝis kaj aperis klare kaj distinge. Tiam ĉiuj fakultoj de ŝia animo, apenaŭ revigliĝinte, estis subite denove deprimitaj: kaj se tiu animo ne estus disponita per senkulpa, rezignacia, kaj fido-plena vivo, la konsterno, kiun ŝi sentis en tiu momento, fariĝus malespero. Post la tumulto de tiuj senvortaj pensoj, la unuaj vortoj venintaj al ŝia menso estis: – ho ve al mi, kion do mi faris! –.

Sed, tiujn vortojn pensinte, ŝi tuj sentis el ili kvazaŭan teruron. Revenis en ŝian memoron ĉiuj cirkonstancoj de la voto, la neeltenebla angoro, la malespero pri helpo, la fervora preĝado, la plena intenco, kun kiu la promeso estis farita. Kaj penti pri la promeso, post ricevo de l' Di-favoro, ŝajnis al ŝi sakrilegia maldanko, perfido al Dio kaj la Madono; ŝajnis al ŝi ke tia malfideleco altiros sur ŝin novajn kaj pli terurajn malfeliĉojn, ĉe kiuj ŝi ne plu rajtos esperi eĉ je preĝado; kaj ŝi rapidis malkonfirmi tiun momentan penton. Ŝi deprenis

⁴ io, kio kuŝas sub la suno: bieneto.

devotece la rozarion el ĉirkaŭ la kolo, kaj tenante ĝin en la tremanta mano, ŝi konfirmis, renovigis la voton, samtempe petante plej elkore la gracon ĝin plenumi, kaj ke al ŝi estu indulgotaj pensoj kaj okazoj povantaj, se ne ŝanceli, tro multe agitegi ŝian animon. La foresto de Renzo, sen ajna ŝanco reveni, tiu foresto, kiu antaŭe estis al ŝi tiom ĉagrena, nunmomente ŝajnis al ŝi kiel Providenca dispozicio, direktinta ambaŭ okazaĵojn por unu sola celo; kaj ŝi klopodis trovi en unu la motivon por kontenti pri la alia. Kaj sekve al tiu penso, ŝi simile imagis, ke, por plenumi la aferon, tiu sama Providenco trovos la rimedon, por ke ankaŭ Renzo rezignaci, ne plu pripensu... Sed tia ideo, apenaŭ trovite, perturbis la menson, kiu ĝin elserĉis. La povra Lucia, sentante sian koron preskaŭ pentonta, revenis al preĝado, al konfirmoj, al batalado, el kiu ŝi leviĝis, se oni al mi indulgas ĉi dirmanieron, kiel vundita kaj laca venkinto super malamiko al-terigita: mi ne diras mortigita.

Subite aŭdiĝas paŝado, bruo de gajaj voĉoj. Temis pri la famiĉeto revenanta el la preĝejo. Du knabinoj kaj unu infano eniras saltetante; ili ekhaltas momente por turni scivolan rigardon al Lucia, poste ili alkuras al panjo, kaj premiĝas ĉirkaŭ ŝin: jen unu demandas la nomon de la nekonata gastino, kaj kiel kaj kial; jen alia volas rakonti la viditajn mirindaĵojn: la bonkora virino respondas al ĉio kaj al ĉiuj per: «silentu, silentu». Poste eniras, kun pli kvieta paŝo, sed kun vizaĝo esprimanta elkoran zorgemon, la dommastro. Li estis, se ni tion ne jam diris, la tajloro de la vilaĝo kaj de l' ĉirkaŭlokoj: viro lego-kapabla, kaj fakte leginta plurfoje la librojn: Legendaro de l' Sanktuloj, Gveren' la Malfeliĉa, kaj la

Gereĝoj de Francujo⁵, kaj estis opiniata tiuloke talentulo kaj scienculo: tian laŭdon li tamen modeste rifuzis, nur dirante, ke li mistrafis vokiĝon; kaj ke se li sin dediĉus al studado, anstataŭ multe da aliaj...! Malgraŭ tio, li estis la plej bonkora homo en la mondo. Ĉar li ĉeestis kiam la parokestro petis lian edzinon fari tiun karitatan vojaĝon, li ne nur aprobis, sed eĉ instigus ŝin, se bezone. Kaj nun, kiam la Di-servo, la pompo, la popolamaso, kaj super ĉio la prediko de la kardinalo ekzaltis⁶, se tiel diri, ĉiujn liajn bonajn sentojn, li rehejmeniĝis kun atenda, zorgema deziro ekscii, kiel do la afero sukcesis, kaj trovi la povran senkulpulinon savita.

«Vidu do», al li diris la bonkora virino ĉe lia eniro, indikante Lucia-n; ŝia vizaĝo ruĝiĝis; ŝi leviĝis kaj komencis balbuti senkulpigajn vortojn. Sed li proksimiĝis, ŝin interrompis, al ŝi festece gratulante, kaj elkriante: «bonvenon, bonvenon! Vi estas Ĉiela beno en tiu ĉi hejmo. Kiom mi ĝojas, vidante vin ĉi tie! Mi ja certis, ke vi bone sukcesos; ĉar neniam mi trovis, ke la Di-Sinjoro komencis miraklon, kaj ne tute plenumis ĝin; sed mi ĝojegas, vidante vin ĉi tie. Povra junulino! Sed ja estas granda afero, esti ricevinta miraklon!»

Kaj oni ne kredu, ke li sola difinis tiun eventon miraklo, pro tio ke li legis la Legendaron de l' sanktuloj: tra la tuta vilaĝo, kaj la tuta ĉirkaŭregiono, oni ne menciis ĝin alimaniere, en la tuta tempo, dum kiu restis pri ĝi memoro. Kaj verdire, kun la aldonitaj franĝoj, al ĝi tute ne konvenus alia nomo.

Poste li proksimiĝis kun diskreteco al la edzino, dum ĉi-

⁵ *Legendaro... Francujo*: tiama populara literaturo pri sanktuloj kaj kavaliroj.

⁶ *ekzaltis*: ekscitis kaj fervorigis.

lasta dekroĉis la kaldronon el la kamen-kateno, kaj al ŝi diris mallaŭte: «Ĉu ĉio iris glate?».

«Bonege: poste mi rakontos al vi ĉion».

«Jes, jes, trankvile».

Poste la mastrino tuj surtabligis kaj iris al Lucia, ŝin akompanis al la tablo, ŝin sidigis; kaj deŝirinte flugilon de tiu kapono, ŝi metis ĝin antaŭ ŝi; ankaŭ ŝi mem kaj la edzo sidiĝis, ambaŭ kuraĝigante la deprimitan kaj honteman gastinon, ke ŝi manĝu. La tajloro ek de l' unuaj buŝ-plenoj komencis paroli kun granda emfazo, interrompate de la infanoj, kiuj manĝis starante ĉirkaŭ la tablo, kaj kiuj verdire tiumatene vidis tro da eksterordinaraj aferoj, por longe roli nur kiel aŭskultantoj. Li priskribis la solenajn ceremoniojn, poste li ekskursis al la mirakla konvertiĝo. Sed tio, kio plej multe impresis lin, kaj al kio lia parolo pli ofte revenis, estis la prediko de la kardinalo.

«Se vidi tian senjoron antaŭ la altaro, kvazaŭ simpla pastro...».

«Kaj tiun oran aferon, kiun li havis surkape...» diris unu knabineto.

«Silentu. Se pensi, mi diras, ke tia senjoro, kaj tiel inteligenta viro, kiu laŭdire legis ĉiujn ekzistantajn librojn, afero, kiun neniu alia sukcesis, eĉ ne en Milano; se pensi ke li kapablas adaptiĝi por diri tiujn aferojn tiamaniere, ke ĉiuj komprenu...».

«Ankaŭ mi mem komprenis», diris la alia klaĉulineto.

«Silentu! Kion vi povis kompreni?».

«Mi komprenis ke li klarigas la Evangelion anstataŭ la parokestro».

«Silentu. Mi ne diras pri homoj, kiuj ion scias; ĉar tiukaze nepras kompreni; sed eĉ la plej malmol-kapaj, eĉ la plej

malkleraj sekvis la fadenon de lia parolo. Vi provu nun demandi ilin, ĉu ili scipovas ripeti la vortojn, kiujn li diris: ja, eĉ ne unu vorton ili trafus; sed la sento restas ĉi tie, en la koro. Kaj, kvankam li ne nomis tiun senjoron, kiel oni komprenis, ke li aludas lin! Kaj krome, por kompreni, sufiĉis rimarki ke li havas larmo-plenajn okulojn. Kaj tiam, la tuta popolo ekploris...».

«Estas tute vere», abruptis la knabo: «sed kial ĉiuj ploris tiumaniere, kiel infanoj?».

«Silentu. Malgraŭ tio, ke ja estas da malmolaj koroj en tiu ĉi vilaĝo. Kaj li klarigis, ke malgraŭ la aktuala malsato, oni devas danki al Dio kaj esti kontenta: fari laŭpove, klopodadi, helpi unu la alian, kaj poste kontenti. Ĉar vera malfeliĉo ne estas la sufero kaj malriĉeco; malfeliĉo estas la malbonfarado. Kaj ne temas pri nur belaj vortoj; ĉar estas konate ke li mem vivas malriĉe, kaj li deprenas panon el sia buŝo por ĝin doni al malsatuloj; malgraŭ tio ke li povus pli ol ĉiuj havi rafinitan viv-nivelon. Ha! tiam, estas ĝojige, aŭskulti tian homon paroli: ne kiel multe da aliaj: faru laŭ mia diro, ne laŭ mia faro. Kaj krome li klarigis, ke eĉ tiuj, kiuj ne estas senjoroj, sed posedas pli ol necese, devas partodoni al suferantoj».

Ĉe tio li interrompis la parolon per si mem, kvazaŭ trafite de ekpenso. Li haltis momente: poste li plenigis teleron prenante el la surtablaj nutraĵoj, kaj aldoninte panbulon, li metis la teleron en buŝ-tukon, kaj preninte ĉi-lastan ĉe la kvar anguloj, li diris al sia pli aĝa knabineto: «kaptu ĉi tie». Li donis en ŝian alian manon flasketon da vino, kaj li aldonis: «iru tien proksimen, al vidvino Maria; lasu al ŝi ĉi tion, kaj diru al ŝi, ke tio ĉi estas, por ke ŝi iom gaju kun siaj filetoj. Sed gardu, tion diru bontone; tiel ke ne ŝajnu, ke vi faras al ŝi

almozon. Kaj nenion diru, se vi renkontas homojn survoje; kaj vi gardu, ke vi ne rompu».

Al Lucia ruĝiĝis la okuloj, kaj ŝi sentis enkore revivigan tenerecon; kiel el la antaŭaj paroloj ŝi estis ricevinta konsolon, kian ne donus ĉi-intenca parolo. Ŝia animo, logite per tiuj priskriboj, per tiuj bildoj pri pompo, per tiuj emocioj el pieco kaj miro, ravite per la entuziasmo mem de la rakontanto, disiĝis de la ĉagrenaj pensoj pri si mem; kaj eĉ revenante al ili, ŝi sentis sin pli fortika kontraŭ ili. Eĉ la penso pri la granda ofero⁷, kvankam ne perdinte sian maldolĉon, tamen kunhavis ian aŭsteran kaj solenan ĝojon.

Post nemulte eniris la vilaĝa parokestro, kiu diris sin sendita de la kardinalo, por informiĝi pri Lucia; por sciigi ŝin, ke la monsinjoro mem volas vidi ŝin en tiu sama tago; kaj por danki lianome al la tajloro kaj ties edzino. Kaj li kaj ŝi, kortuŝite kaj konfuzite, ne trovis taŭgajn vortojn por respondi al tiaj esprimoj de tia eminentulo.

«Kaj ĉu via patrino ankoraŭ ne alvenis?» diris la parokestro al Lucia.

«Mia patrino!» elkriis ĉi-lastata. Kiam la parokestro aldonis, ke li jam sendis por venigi ŝin, laŭ ordono de la ĉefepiskopo, ŝi al si metis la antaŭtukon ĉe la okuloj, kaj eksplodis je plorego, kiu daŭris longe post la foriro de la parokestro. Poste, kiam pli trankvilaj pensoj komencis anstataŭi la tumultajn sentojn estiĝintajn ĉe tiu anonco, la povrulino ekmemoris ke tiel baldaŭa konsolo, nome revidi la patrinon, konsolo tiom neatendita antaŭ nemulte da horoj, estis de ŝi preĝ-petita en tiuj teruraj momentoj, kaj metita kvazaŭ voto-kondiĉo. *Revenigu min sendamaĝa al mia patrino, ŝi*

⁷ *granda ofero*: la voto rezigni edziniĝon.

tiam diris; kaj tiuj vortoj nun reaperis klaraj en ŝia memoro. Ŝi al si plej konfirmis la intencon plenumi la promeson, kaj denove kaj pli maldolĉe sentis la skrupulon pro tiu *ve al mi!*, kiun ŝi mense ellasis unua-momente.

Fakte Agnese, kiam oni pri ŝi parolis, estis jam sufiĉe proksima. Facile imageblas, kiel impresiĝis la povra virino, ĉe tiu neatendita invito kaj tia sciigo, necese stumpa kaj konfuza, pri danĝero, nun fakte ĉesigita, sed terura; pri horora okazaĵo, kiun la sendito scipovis nek detale priskribi nek klarigi; kaj ŝi ne havis elementojn, por ĝin klarigi per si mem. Metinte la manojn en la kap-harojn, elkriinte plurfoje: «ha Sinjoro! ha Madono!», farinte al la sendito diversajn demandojn, al kiuj li ne sciis respondi, ŝi tute haste surkaleŝiĝis, daŭrigante dumvojaĝe elkrii kaj fari demandojn, sensukcese. Sed iumomente ŝi renkontis Don Abbondion venantan malrapide, antaŭmetante ĉiu-paŝe sian bastonon. Post ambaŭflanka «ho!», li ekhaltis, ŝi haltigis kaj elkaleŝiĝis; kaj ili apartiĝis en kaŝtan-arbaron, kiu flankis la vojon. Don Abbondio informis ŝin pri tio, kion li sukcesis ekscii, kaj devis vidi. La afero ne estis klara; sed Agnese estis almenaŭ certigita, ke Lucia certe elsaviĝis; kaj ŝi libere spiris.

Poste Don Abbondio volis tuŝi alian temon, kaj doni al ŝi longan instrukcion, kiel kondukti kun la ĉefepiskopo, se ĉi-lastata, kiel verŝajne, dezirus paroli kun ŝi kaj ŝia filino; kaj ĉefe ke ne konvenos fari mencion pri la geedziĝo... Sed Agnese, kompreninte, ke la honestulo parolas nur por sia profito, forlasis lin sen promeso, eĉ sen ajna decido; ĉar tute aliaj problemoj ŝin zorgigis. Kaj ŝi daŭrigis la vojaĝon.

Fine la kaleŝo alvenas, kaj ekhaltas antaŭ la domo de la tajloro. Lucia leviĝas rapidege; Agnese elkaleŝiĝas kaj en-

kuras: jen unu inter la brakoj de la alia. La edzino de la tajloro, kiu sola ĉeestas, kuraĝigas ambaŭ, kvietigas ilin, gratulas ilin, kaj poste, plu diskreta, ŝi lasas ilin solaj, dirante, ke ŝi iras pretigi liton por ili; ke ŝi tion povas, sen tro da problemoj; sed ke ĉiuokaze kaj ŝi kaj ŝia edzo preferus dormi surplanke ol lasi ilin forserĉi tranoktejon aliloke.

Post tiu unua ellaso de brakumoj kaj singultoj, Agnese volis ekscii la okazintaĵojn de Lucia, kaj ĉi-lastata komencis ilin anhele rakonti al ŝi. Sed, kiel la leganto scias, temis pri historio, kiun neniu tute konis; kaj eĉ por Lucia iuj partoj estis obskuraj, tute ne klarigeblaj. Kaj precipe tiu fatala koincido, ke la terura kaleŝo troviĝis tie surstrate ĝuste dum Lucia pasis pro tute eksterordinara hazardo: pri tio kaj panjo kaj filino faris cent konjektojn, neniam divenante nek eĉ proksimiĝante al la vero.

Koncerne la iniciatinton de la intrigo, ambaŭ nepre supozis ke temas pri Don Rodrigo.

«Ha nigra animo! ha infera brul-ŝtipo!» elkriis Agnese: «Sed ja venos la pun-horo ankaŭ por li. La Di-Sinjoro lin pagos laŭmerite; kaj tiam ankaŭ li mem spertos...».

«Ne, ne, panjo; ne!» interrompis Lucia: «ne deziru al li suferon, al neniu deziru ĝin! Se vi scius, kion signifas sufero! Se vi spertus! Ne, ne! prefere ni preĝu Dion kaj la Madonon por li: ke Dio tuŝu lian koron, kiel li faris al ĉi-alia povra senjoro, kiu estis pli aĉa ol li; kaj nun li estas sanktulo».

La abomeno, kiun Lucia sentis, repensante tiel ĵusajn kaj kruelajn memorojn, interrompigis plurfoje ŝian diron; plurfoje ŝi diris, ke ŝi ne kuraĝas plu paroli, kaj post multe da larmoj ŝi pene daŭrigis la rakonton. Sed alia sento ŝin heziligis, dum la rakonto: kiam temis pri la voto. La timo ke la patrino ŝin

kvalifikos senprudenta kaj senpripensa; kaj ke, kiel ŝi jam faris koncerne la aferon de la geedziĝo, ŝi pretekstos ian malrigoran konscienc-regulon kaj tute klopodos tion pravigi; aŭ ke, kiel povra virino, ŝi al iu konfidencos tiun sekreton, almenaŭ por ekhavi lumon kaj konsilon, kaj tiel publikigos ĝin: afero, ĉe kies nura penso Lucia sentis la vizaĝon ruĝiĝi; ankaŭ ia honto eĉ antaŭ la patrino, neeksplikebla malinklino tuŝi tiun temon; ĉi-ĉio efikis, ke ŝi kaŝis tiun gravan detalon, intencante konfidenci ĝin antaŭe al patro Cristoforo. Sed kiel ŝi ŝokiĝis, kiam, demandinte pri li, ŝi aŭdis, ke li ne plu ĉeestas, ke li estis sendita en foran, foran lokon, en lokon kun stranga nomo!

«Kaj kio pri Renzo?» diris Agnese.

«Li elsaviĝis, ĉu ne?» diris anxie Lucia.

«Tio estas certa, ĉar ĉiuj tion diras; oni taksas certe, ke li rifuĝis en la Bergaman teritorion; sed la ĝustan lokon neniu scipovas diri: kaj li ĝis nun nenion sciigis. Eble ĉar li ankoraŭ ne trovis la rimedon por tion fari».

«Ha, se li estas savita, estu danko al la Sinjoro!» diris Lucia; kaj ŝi strebis ŝanĝi parol-temon; kiam la parolon interrompis neatendita novaĵo: la apero de l' kardinalo ĉefepiskopo.

Reveninte el la preĝejo, kie ni lasis lin, aŭdinte el la nenomito, ke Lucia alvenis sana kaj sendanĝera, li ĉe-tabliĝis kun li, sidigante lin lia-dekstre, meze de krono el pastroj, kiuj nesatigeble okulumis al tiu aspekto nun tiel milda sen febleco, humila sen malbraveco, kaj komparis ĝin kun la bildo kiun de longe ili imagis pri tiu famulo.

Post la tagmanĝo, ambaŭ apartiĝis denove kune. Post interparolo daŭrinta multe pli longe ol la unua, la nenomito

forrajdis al sia kastelo, sur la sama mulino kiel matene; kaj la kardinalo, veniginte la parokestron, al li diris ke li deziras esti kondukita al la domo kie gastas Lucia.

«Ho monsinjoro!» respondis la parokestro, «ne ĝeniĝu: mi mem tuj sendos anonci, ke venu ĉi tien la junulino, la patrino, se ŝi jam alvenis, kaj ankaŭ la gastigantoj, se vi, monsinjoro, ilin volas: ĉiuj kiujn via eminentega moŝto deziras».

«Mi mem deziras ilin viziti» replikis Federigo.

«Via eminentega moŝto ne devas ĝeniĝi: mi tuj sendos voki ilin: tio bezonas nur momenton», insistis la parokestro-fuŝulo (aliflanke bonkora homo), kiu ne komprenis ke la kardinalo per tiu vizito intencas samtempe honori malfeliĉon, senkulpecon, gastamecon, kaj sian oficon. Sed, ĉar la superulo esprimis denove la saman deziron, la subulo sin klinis kaj ekiris.

Kiam la du ekleziuloj aperis surstrate, la tuta ĉeestanta popolo aliris al ili; kaj post nelonge da ĝi amasiĝis el ĉiu direkto: marŝante lia-flanke tiuj kiuj povis, kaj la aliaj malantaŭe, senorde. La parokestro zorgis diri: «For, retro, retiriĝu; nu! nu!». Federigo al li diris: «Lasu ilin», kaj plu-iris, jen levante la manon por beni la popolon, jen mallevante ĝin por karesi la knabojn venantajn ĝis liaj piedoj. Tiel ili atingis la domon, kaj eniris: la popolo restis amase ekstere. Sed en la amaso troviĝis ankaŭ la tajloro, kiu estis sekvinta lin kiel la aliaj, fiks-okule kaj gape, tute ne sciante, kien li celas. Kiam li vidis tiun neatenditan 'kien', li trabatis al si la vojon, imagu kun kia bruo, kriante kaj rekriante: «lasu do pasi tiun, kiu pasi devas»; kaj li eniris.

Agnese kaj Lucia ekaŭdis kreskantan zumadon surstrate; dum ili pripensis, kio do povas esti, ili vidis la pordon tute

malfermiĝi, kaj la purpurulon aperi kun la parokestro.

«Ĉu estas ŝi?» demandis la unua al la dua; kaj ĉe ties jesa gesto, li aliris al Lucia, restinta tie kun la patrino, ambaŭ senmovaj kaj senparolaj pro l' surprizo kaj l' honto. Sed tiu voĉ-tono, la aspekto, la teniĝo, kaj ĉefe la vortoj de Federigo ilin tuj revigligis. «Povra junulino», li komencis: «Dio permesis ke vi suferu grandan provon; sed li ankaŭ montris, ke li ne forigis de vi sian rigardon, ke li ne forgesis vin. Li elsavis vin; kaj li faris vin peranto de granda ago, por fari grandan mizerikordon al unu, kaj samtempe levi el premateco multajn».

Ĉe tio aperis en la ĉambro la mastrino, kiu, ĉe l' bruo, estis ankaŭ ŝi mem elŝovinta la kapon el la fenestro, kaj vidinte, kiu do eniras en ŝian hejmon, kure desupris tra la ŝtuparo, ordiginte sin kiel eble rapide; kaj preskaŭ samtempe eniris la tajloro tra alia pordo. Vidante la interparolon komencita, ili kuniris en angulon, kie ili restis kun granda respekto. La kardinalo, ilin afable salutinte, daŭrigis paroli kun la virinoj, miksante kun la konsoloj kelke da demandoj, por vidi, ĉu el la respondoj li povas trovi oportunon por bonfari al tiuj ege suferintaj.

«Necesus ke ĉiuj pastroj estu kiel via moŝto, ke ili iom partianu por malriĉuloj, kaj ne kunlaboru por ilin impliki, por elturni sin mem», diris Agnese, kuraĝigite de tiel familiara kaj amema teniĝo de Federigo, kaj kolereta, ĉe l' penso, ke sinjoro Don Abbondio ĉiam oferis aliulojn kaj nun pretendas malhelpi etan ellason, plendon antaŭ lia superulo, ĉe eksterordinara oportuno fari tion.

«Ja diru, kion vi pensas», diris la kardinalo: «parolu libere».

«Mi volas diri ke, se nia sinjoro parokestro tiam farus sian devon, la afero poste ne irus tiele».

Sed, ĉar la kardinalo plu insistis, ke ŝi klarigu pli bone, ŝi komencis embarasiĝi, devante rakonti historieton, en kiu ŝi mem ludis rolon, kiun ŝi ne volus sciigi, ĉefe al tia eminentulo. Tamen ŝi eltrovis la manieron por manipuli la rakonton per eta prisilento: ŝi rakontis pri la fiksita geedziĝo, pri la rifuzo de Don Abbondio, ŝi ne silentis ke li pretekstis pri *la superuloj* (ha, Agnese!); kaj ŝi saltis al la atenco de Don Rodrigo, kaj ke, avertite, ili sukcesis forkuri. «Ha jes», ŝi aldonis kaj konkludis: «forkuri por stumbli denove. Se male sinjoro parokestro tiam dirus al ni sincere la aferon, kaj tuj geedzigus miajn povrajn geknabojn, ni tuj forirus, ĉiuj kune, kaŝe, en foran lokon, kie eĉ ne la aero povus tion scii. Tiele oni perdis tempon, kaj estiĝis kio estiĝis».

«La sinjoro parokestro ja donos al mi konton pri tiu ĉi afero», diris la kardinalo.

«Ne, sinjoro, ne, sinjoro», tuj diris Agnese: «mi ne parolis ĉi-cele: vi ne riproĉu lin, ĉar ĉiel ajn tio, kio okazis, ja okazis; kaj krome ĝi al nenio utilis: li ja estas tia: ĉe denova kazo li farus denove la samon».

Sed Lucia, ne kontenta pri tiu maniero rakonti la historion, aldonis: «ankaŭ ni mem malbonfaris: videblas ke ne estis Dia volo, ke la afero sukcesu».

«Kian malbonon povis fari vi, povra junulino?» diris Federigo.

Lucia, malgraŭ la okulumaĉoj, kiujn la patrino kaŝe al ŝi turnis, rakontis pri la provo farita en la hejmo de Don Abbondio; kaj ŝi konkludis dirante: «ni malbonfaris; kaj Dio nin punis».

«Akceptu el lia mano la suferojn kiujn vi eltenis, kaj estu serena», diris Federigo: «ĉar, kiu do rajtas ĝoji kaj esperi, se ne l' homo, kiu suferis, kaj tamen strebas kulpigi sin mem?».

Tiam li demandis, kie do estas la fianĉo, kaj aŭdante el Agnese (Lucia silentis, kun mallevitaj kapo kaj okuloj) ke li forfuĝis el sia vilaĝo, li eksentis kaj esprimis miron kaj bedaŭron; kaj li deziris ekscii la kialon.

Agnese rakontis laŭpove la malmulton, kiun ŝi sciis pri la historio de Renzo.

«Mi aŭdis paroli pri tiu ĉi junulo», diris la kardinalo: «sed kial do viro implikita en aferoj tiaj, povis esti edziĝonta kun tia knabino?».

«Li estis bonmora junulo», diris Lucia, kun ruĝiĝanta vizaĝo, sed kun firma voĉo.

«Li estis eĉ tro kvieta», aldonis Agnese: «kaj pri tio vi povas pridemandi ĉiun ajn, eĉ sinjoron parokestron. Kiu do scias kian kaĉon oni kombinis tie, kiajn kabalajn? Sufiĉas malmulte por ŝajniĝi malriĉulojn friponoj».

«Tio veras bedaŭrinde», diris la kardinalo: «mi sendube informiĝos pri li»: kaj demandinte la bapton kaj familian nomon de l' junulo, li notis ilin sur memor-kajereto. Li aldonis, ke li intencas veturi al ilia vilaĝo post kelke da tagoj, kaj tiam Lucia povos tien veni sen-time, kaj dumtempe li zorgos havigi al ŝi lokon, kie ŝi povos resti sekura, ĝis ĉio estos plej bone aranĝita.

Poste li sin turnis al la dom-mastroj, kiuj tuj alproksimiĝis. Li renovigis la dankojn, kiujn li jam havigis per la parokestro, kaj li demandis, ĉu ili ŝatus loĝigi, dum ĉi-kelke da tagoj, la gastinojn al ili de Dio senditajn.

«Ho! jes, sinjoro», respondis la virino kun voĉ-tono kaj

mieno, kiu esprimis ege pli multe ol tiu seka respondo, sufokita per la honto. Sed la edzo, tute ekscitita pro l' ĉeesto de tia demandanto, pro l' deziro honori sin ĉe tiom grava evento, angore elserĉis ian belan respondon. Li faltigis la frunton, strab-tordis la okulojn, kun-premis la lipojn, streĉis plej forte la paf-arkon de sia intelekto, serĉis, tra-serĉis, sentis en sia interno interbatiĝon de stumpaj ideoj kaj duonaj vortoj: sed la momento urĝis: la kardinalo jam gestis, ke li interpretis lian silenton: la povrulo malfermis la buŝon, kaj diris: «*imagu do!*⁸». Nenio alia volis elbuŝiĝi. Afero, kiu ne nur lin deprimis ĉe-momente; sed eĉ pli poste tiu maloportuna memoro al li fuŝis ĉiufoje la plezuriĝon pri l' granda ricevita honoro. Kaj kiomfoje, rememorante, kaj repensante tiun cirkonstancon, venis en lian menson, kvazaŭ spiteme, pluraj vortoj, ĉiuj pli bonaj ol tiu sensuka *imagu do!* Sed, kiel diras antikva proverbo, vane post evento abundas prudento.

La kardinalo foriris, dirante: «La beno de la Di-Sinjoro estu super ĉi tiu domo».

Vespere li demandis la parokestron, kiel konvene rekompenci pro la multe-kosta gastigo tiun viron, supozeble ne riĉan, ĉefe en tia tempo. La parokestro respondis ke, verdire, nek la gajnoj el la metio, nek la rentoj el iuj kampetoj, kiujn la tajloro havis proprete, sufiĉus, en tiu magra jaro, por igi lin malavara kun aliuloj; sed ke, farinte ŝparojn en la pasintaj jaroj, li fakte estas inter la plej bonstataj en la ĉirkaŭaĵo, kaj ke li povas sen bankroto fari ian kroman elspezon, kiel certe volonte li faras ĉi-kaze; kaj cetere li tute malakceptus ajnan rekompencan.

⁸ *imagu do!* = memkompreneble! Sed tiu dirmaniero, adresita al tia altrangulo, hontigis la tajloron, kiu trovis ĝin tro malsolena, tro familiara.

«Verŝajne li havas ŝuldantojn ne pagipovajn».

«Pensu, eminentega monsinjoro: ĉi-popolo pagas per superfluaĵoj el la rikolto: pasintjare nenio superfluis; ĉi-jare ĉiuj rikoltis malpli ol necese por vivteni sin».

«Do», diris Federigo: «mi surprenas ĉiujn ĉi ŝuldojn; kaj vi bonvolos al mi havigi lian noton de l' kontoj, kaj ilin elpagi».

«Temos pri rimarkinda sumo».

«Des pli bone: kaj bedaŭrinde vi havos aliajn eĉ pli bezonantajn, kiuj ne havas ŝuldojn, ĉar ili ne trovas krediton».

«He, bedaŭrinde! Oni faras laŭpove; sed kiel atingi ĉien, en tempo ĉi tia?». «Igu ke li survestu ilin miakonte, kaj pagu lin abunde. Verdire ĉi-jare al mi ŝajnas preskaŭ ŝtelita ĉia elspezo ne por pano; sed ĉi tiu estas escepta kazo».

Ni tamen ne volas fini la historion pri tiu tago ne rakontante mallonge, kiel finis ĝin la nenomito.

Ĉi-foje la sciigo pri lia konvertiĝo antaŭis lin tra la valo; kaj ĝi tuj disvastiĝis, kaj enmetis ĉie konsternon, angoron, ĉagrenon, murmuron. Al la unuaj bravuloj, aŭ servistoj (estis same), kiujn li ekvidis, li gestis, ke ili sekvu lin, kaj tiel sinsekve. Ĉiuj lin sekvis kun nova suspenso kaj kutima obeemo; ĝis li atingis la kastelon, kun pli kaj pli grandiĝanta sekvantaro. Li gestis al la starantaj ĉe la pordo sekvi lin kune kun la aliaj; li eniris la unuan korton, atingis ties mezon, kaj tie, ankoraŭ rajd-sidante, li eligis tondran krion: temis pri la kutima signalo, ĉe kiu devis kunveni ĉiuj aŭdintoj. Unumomente ĉiuj, kiuj troviĝis en la diversaj partoj de la kastelo, iris direkte al la voĉo, kaj kuniĝis kun la jam kunvenintaj, ĉiuj rigardante la mastron.

«Iru atendi min en la ĉef-salonego», kaj de sur la rajd-

besto, li rigardis ilin foriri. Poste li deseliĝis, kondukis mem la rajd-beston al la stalo, kaj iris al la loko, kie li estis atendata. Ĉe lia apero tuj ĉesis la granda flustrado; ĉiuj kunpremiĝis unuflanken, lasante por li vaka grandan spacon de la salonego: konjekteble temis pri trideko da homoj.

La nenomito levis la manon, kvazaŭ por gardi tiun subitan silenton; li levis la kapon, kiu superis ĉiujn kapojn de la anaro, kaj diris: «aŭskultu ĉiuj, kaj neniu parolu, ne demandite. Filetoj! la vojo, laŭ kiu ni marŝis ĝis nun, kondukas en la infer-fundon. Ne riproĉon volas al vi fari mi, kiu superas ĉiujn, pli fias ol ĉiuj; sed aŭskultu, kion mi al vi diros. Dio, la kompatema, vokis min al kondukt-ŝanĝo; kaj mi ŝanĝos ĝin, mi jam ĝin ŝanĝis: tiel li faru ankaŭ pri vi ĉiuj. Vi sciu do, kaj certu, ke mi estas rezoluta morti prefere ol plu fari ion kontraŭ lia sankta leĝo. Mi malkomisias vin je la krimaj ordonoj, kiujn vi ricevis de mi; vi komprenas min; mi eĉ ordonas vin, fari nenion el tio, kio estas al vi ordonita. Kaj same certu, ke neniu ek de nun rajtos malbonfari, protektate de mi, serve al mi. Kiu volas resti ĉi-kondiĉe, tiu estos al mi kvazaŭ fileto: kaj mi sentus min feliĉa fine de l' tago, en kiu mi mem fastus por satigi la lastan el vi, per la lasta pano restinta en mia hejmo. Kiu ne volas, al tiu estas donota la ŝuldata salajro, kaj kroma donaco: li rajtos foriri; sed li ne plu enpaŝu ĉi tien, krom por ŝanĝi konduton; ĉar ĉi-kaze li ĉiam estas akceptota kun malfermitaj brakoj. Pripensu la aferon ĉi-nokte: morgaŭ matene mi vokos vin po unu, por ke vi respondu; kaj tiam mi donos al vi novajn ordonojn. Nun retiriĝu, ĉiu al sia posteno. Kaj Dio, kiu tiom kompatis min, sendu al vi bonan penson».

Ĉe tio li finis, kaj ĉio restis silenta. Kiom ajn diversaj kaj tumultaj pensoj bolis en tiuj cerbaĉoj, eĉ ne unu signo pri ili

aperis ekstere. Ili kutimis konsideri la voĉon de sia mastro kiel esprimon de volo, kontraŭ kiu ne eblas repliki: kaj tiu voĉo, anoncanta ke tiu volo estas ŝanĝita, tute ne indicis, ke ĝi malfortikiĝis. Tute neniu ekpensis, ke, ĉar li konvertiĝis, oni povus lin superi, al li respondi kiel al alia homo. Ili vidis lin sanktulo, sed unu el tiuj sanktuloj, kiujn oni pentras kun levita kapo, kaj la glavo en-mane. Krom la timo, ili havis por li (precipe la naskitaj lia-hejme, kaj temis pri granda parto de ili) ankaŭ am-senton, kiel homoj tute obeemaj; ĉiuj cetero havis rilate lin admiran ŝaton; kaj en lia ĉeesto ili sentis specon de, mi diru, deteniĝo, kiun eĉ plej krudaj kaj spitemaj animoj sentas fronte al agnoskita supereco. Cetero la aferoj tiam aŭditaj el tiu buŝo ja estis abomenaj al iliaj oreloj, sed ne falsaj nek fremdaj al iliaj mensoj: se ili milfoje primokis ilin, tio okazis ne ĉar ili malkredas ilin, sed por preventi per moko la timon, kiu estiĝus, se ilin serioze pripensi. Kaj nun, vidante la efekton de tiu timo en tia animo de sia mastro, tute ĉiuj estis pli-malpli tuŝitaj de tiu timo, almenaŭ provizore. Aldoniĝu, ke tiuj inter ili, kiuj, estinte tiu-matene ekster la valo, eksciis unue la grandan novaĵon, vidis kaj raportis ankaŭ la ĝojon, la jubilon de la popolo, la amon kaj respektagon por la nenomito, anstataŭ la antaŭaj malamo kaj teruro. Tiel ke, en la viro, kiun ĉiam ili rigardis, se tiel diri, desube, eĉ kiam ili mem estis grand-parte lia forto, ili nun vidis la mirindaĵon, la idolon de l' popolamaso; ili vidis lin super la ceteraj alie ol antaŭe, sed ne malplie; daŭre ekster la ordinara amaso, daŭre la ĉefo.

Ili do staris konsternitaj, dubemaj unu pri la alia, kaj ĉiu pri si mem. Unu ronĝiĝis, dua planis, kie serĉi gastigon kaj dungon; tria ekzamenis sin, ĉu li kapablos akomodiĝi al honestula vivo; alia, tuŝite per tiuj vortoj, eĉ sentis inklinon al

tio; alia, tute nenion decidinte, intencis ĉiuokaze promesi ĉion, kaj dume resti, por manĝi tiun panon tiel bonvole proponitan, kaj tiam tiel malabundan, kaj prokrastumi: tute neniu elbuŝigis vorteton. Kaj kiam la nenomito, fine de sia parolo, levis denove tiun ordoneman manon, por gesti, ke ili foriru, ili tute kviete, kvazaŭ ŝafaro, ĉiuj kune foriĝis. Ankaŭ li mem eliris malantaŭ ili, kaj, stariginte sin meze de l' korto, rigardadis, ĉe l' krepusko, kiel ili disiras ĉiu al sia posteno. Poste, alsuprinte por preni sian lanternon, li denove trairis la kortojn, la koridorojn, la salonojn, li revuis ĉiujn enirejojn, kaj kiam li vidis, ke ĉio estas kvieta, li fine foriris dormi. Jes, dormi; ĉar li dormemis.

Neniam antaŭe, en nenia situacio, li troviĝis implikita en tiom da komplikaj kaj samtempe urĝaj aferoj, kvankam li ĉiam serĉis da tiaj; kaj tamen li dormemis. La rimorsoj, kiuj lin maldormigis hieraŭ-nokte, ne nur ne kvietiĝis, sed eĉ kriegis pli laŭte, pli severe, pli absolute; kaj tamen li dormemis. La ordon, la regadon de li tie starigitan dum tiom da jaroj, per tiom da streboj kaj per unika kunmeto de aŭdaco kaj obstino, ĵus li mem malfirmigis per malmulte da vortoj; la senliman dependon de liaj anoj, ilian disponon al ĉio, ilian rabistecan fidelecon, sur kiu li jam delonge kutimis ripozi, ĵus li mem ŝancelis; li transformis siajn rimedojn en amason da implikoj, li enkondukis konfuzon kaj necertecon en sian domon; kaj tamen li dormemis.

Li iris do en dormo-ĉambron, proksimiĝis al tiu lito, en kiu li hieraŭ-nokte trovis tiom da dornoj; kaj apud ĝi li genuiĝis, intencante preĝi. Fakte li trovis en izola kaj profunda anguleto de l' memoro, la preĝojn lernitajn infan-aĝe; li komencis ilin reciti; kaj tiuj vortoj, tiom longe kunvolvite,

eliĝis unu post alia, kvazaŭ el faden-globo. Ĉe tio li spertis nedifineblan miksaĵon de sentoj; ian dolĉecon ĉe tiu vorta reveno al la kutimoj de sia senkulpa aĝo; pli akran ĉagrenon pripensante la abismon, de li metitan inter tiu tempo kaj la nuna; ardan deziron atingi, per pentofaroj, novan konsciencan, staton kiel eble plej proksiman al la senkulpeco, al kiu li ne povis reveni; dank-senton, fidemon en tiu Dia mizerikordo, povanta lin konduki al tiu stato, kaj jam al li doninta tiom da signoj pri tiu volo. Poste li sin levis, enlitiĝis kaj tuj endormiĝis.

Tiel finiĝis tiu tago, ankoraŭ tre fama, kiam nia anonimulo verkis; kaj nun, sen li, oni scius nenion, almenaŭ pri detaloj; ĉar la supre menciitaj Ripamonti kaj Rivola nur diras ke tiu eminenta tirano, post interparolo kun Federigo, ŝanĝis mirinde kaj definitive sian vivon. Sed kiom da homoj legis la librojn de tiuj du historiistoj? Eĉ malpli multe ol tiuj, kiuj legos la nian. Kaj kiu scias ĉu, en tiu sama valo, se iu havus la emon ĝin serĉi, kaj la lerton ĝin trovi, restas konfuza tradicio pri l' evento? Tiom multe da aferoj estiĝis de post tiu tempo!

La postan tagon, en la vilaĝeto de Lucia kaj la tuta teritorio de Lecco, oni parolis nur pri ŝi, pri la nenomito, pri la ĉefepiskopo, kaj pri alia homo, kiu, kvankam ĝenerale tre ema esti menciata, tamen en tiu cirkonstanco tre volonte tion evitus: ni aludas senjoron Don Rodrigo.

Kompreneble eĉ antaŭe oni menciis liajn farojn; sed temis pri stumpaj, sekretaj paroloj: por tuŝi tiun ĉi temon, nepris ke du homoj tute konu sin reciproke. Kaj krome ili ne enmetis la tutan senton, kiom ili kapablis: ĉar ĝenerale la homoj, kiam ne eblas sen grava danĝero ellasi sian indignon, ne nur esprimas ĝin nur parte, aŭ tute prisilentas ĝin, sed efektive ili sentas ĝin malpli intense. Sed nun, kiu do sin detenus sciiĝi kaj paroli pri tiel brua evento, en kiu videblis la mano de l' Ĉielo, kaj kie rolis bele du tiaj eminentuloj? unu, en kiu tre aŭdaca amo al justeco kunis kun altega aŭtoritateco; la alia, per kiu ŝajnis ke la perforteco mem sin humiligis, ke la spiteco venis, se tiel diri, cedi la armilojn kaj peti batal-halton. Kompare kun ili, senjoro Don Rodrigo aspektis iom nana. Tiam ĉiuj komprenis, kion signifas turmenti senkulpecon por ĝin malhonoru, persekutu ĝin kun tiel senhonta persisteco, kun tiel kruela perforto, kun tiel abomenindaj insidoj. Ĉe-okaze oni revuis multe da aliaj prodaĵoj de tiu senjoro: kaj pri ĉio oni esprimis siajn sentojn, ĉiu kuraĝigite de tio, ke ĉiuj konsentis. Estis murmuro, ĝenerala koler-vibro; singarde tamen, kaŭze de la bravuloj, kiujn tiu viro ĉirkaŭhavis.

Granda parto de tiu malamo trafis ankaŭ liajn amikojn kaj korteganojn. Oni taŭge rostis sinjoron komunumestron, ĉiam surdan kaj blindan kaj mutan pri l' faroj de tiu tirano; sed ankaŭ pri li nur singarde, ĉar, se li ne havis bravulojn, li

sbirojn tamen havis. Pri doktoro Impliktrafulo, kiu havis nur babilojn kaj kabalajn, kaj pri aliaj similaj korteganetoj, oni ne estis tre singarda: oni ilin fingro-montris, kaj strab-okule rigardis; tiel ke, dum iom da tempo, ili taksis oportune ne aperi surstrate.

Don Rodrigo, surprizegite per sciigo tiel neatendita, tiel malsama ol la avizo, kiun li atendis de tag' al tago, de moment' al momento, restis forkaŝite en sia domo, sola kun siaj bravuloj, ronĝante sin dum du tagoj; la trian, li ekforiris al Milano. Se temus nur pri l' murmuraĉo de l' popolo, eble, konsidere ke la afero jam tiagrade progresis, li restus ĝuste por alfronti ĝin, eĉ por serĉi la oportunon fari ekzemplo-donan venĝon super iu el la plej aŭdacaj; sed lin forpelis la certa sciigo ke la kardinalo venas ankaŭ tien. La onklo grafo, kiu pri tiu ĉi historio konis nur la diritaĵon de Attilio, certe postulos, ke, en tia cirkonstanco, Don Rodrigo pompe rolu, kaj igu ke la kardinalo akceptu lin publike, kun granda honoresprimo: nu, ĉiu vidas, kiel taŭge li estis survoje al tio. La onklo grafo postulos pri tio detalan raporton; ĉar ĝi estis grava oportuno elmontri kian estimon ĝuas lia familio ĉe unuaranga eminentulo. Por elturniĝi el tiel ĝena impliko, Don Rodrigo, ellitiĝinte iun matenon antaŭ la sun-leviĝo, enkaleŝiĝis, kun la Grizulo kaj aliaj bravuloj ekstere, antaŭe kaj malantaŭe; kaj ordoninte, ke la cetera servistaro venu pli poste, li foriris kiel fuĝanto, kiel (estu al ni permesate levi niajn rolulojn per eminentaj komparoj) kiel Katilino el Romo, snufante, kaj ĵurante reveni baldaŭ, en tute alia teniĝo, por fari taŭgajn venĝojn.

Dume la kardinalo vizitis, po unu ĉiutage, la parokojn de la Lecco-teritorio. La tagon, kiam li estis venonta en la

parokon de Lucia, granda parto de la loĝantoj jam iris surstraten al li renkonte. Ĉe l' enirejo en la vilaĝon, ĝuste apud la dometo de niaj du virinoj, staris triumf-arko, el vertikalaj fostoj kaj transversaj stangoj, tegita per pajlo kaj musko, ornamita per verdaj branĉoj de ilekso kaj rusko¹, en kiuj distingiĝis skarlataj beroj; la preĝeja fasado estis tute tapetita; ĉe ĉiu fenestro-breto pendis etenditaj lit-kovriloj kaj lit-tukoj, infan-vindoj dismetitaj festone; tiu malmulte da objektoj necesaj, pli-malpli taŭgaj aspekti kiel superflujaj. Ĉirkaŭ la dudekdua², kiu estis la horo kiam oni atendis la kardinalon, ankaŭ la restintaj hejme, plej grand-parte olduloj, virinoj kaj infanoj, ekiris al li renkonte, iom vice kaj iom grupe, kun ĉe-fronte Don Abbondio, ĝenate meze de tiel granda festo, kaj pro la bruoj, kiu konfuzis lin, kaj pro la svarmado antaŭen kaj reen de l' popol-amaso, kiu, kiel li ripetis, al li turnis la kapon, kaj pro la sekreta ronĝ-timo, ke la virinoj eble klaĉis, kaj li devos doni konton pri tiu ne plenumita geedzigo.

Kaj jen aperas la kardinalo, aŭ pli ĝuste la popol-amaso, en kies mezo li troviĝis sur port-lito, kun sia sekvantaro; ĉar el ĉi-ĉio vidiĝis nur unu indico enaere: tio estas: super ĉiuj kapoj, parto de la kruco, kiun portis kapelano rajdanta sur mulino. La popolo marŝanta kun Don Abbondio senorde rapidis atingi la alian; kaj li, dirinte tri kaj kvar fojojn: «Malrapide; envice; kion do vi faras?» returnis sin agacite; kaj plu grumblante: «estas babelo, estas babelo», li eniris la preĝejon, dum ĝi estis ankoraŭ malplena; kaj tie li restis atende.

La kardinalo venis, benojn donante per la mano, kaj ilin

¹ *ilekso kaj rusko*: ornamaj plantoj.

² *la dudekdua*: laŭ la tiama hor-sistemo, du horojn antaŭ la sun-subiro.

ricevante el la buŝoj de la popolo, kiun lia anaro penegis iom reteni. Apartenante al la vilaĝo de Lucia, tiu popolo intencis fari al la ĉefepiskopo eksterordinarajn elmontrojn; sed la afero ne estis facila, ĉar kien ajn li alvenis, ĉiuj ĝenerale faris kiel eble plej multe. Jam komence de lia episkopado, ĉe lia unua solena eniro en la Milanan katedralon, la premiĝo kaj impeto de la homoj kontraŭ lin estis tiaj, ke oni timis pri lia vivo; kaj iuj nobeloj, kiuj estis al li proksimaj, elingigis la glavojn por teruri kaj repeli la amason. Tiom da malordo kaj perforto estis en tiuj moroj, ke eĉ ĉe elmontro de bonvolo al episkopo enpreĝeje, kaj por ties moderigo, oni devis riski murdi. Kaj eĉ tiu protekto eble ne sufiĉus, se la estro kaj la vic-estro de l' ceremonioj, famili-nome Clerici kaj Picozzi, junaj pastroj bonfartaj kaj korpe kaj anime, ne lin levus surbrake kaj lin portus de la pordego ĝis la ĉef-altaro. Ek de tiam, en la multnombraj vizitoj de li faritaj en la Milania teritorio, oni povas senŝerce kalkuli liajn enirojn en preĝejojn inter liaj paŝtistaj penoj, kaj foje eĉ inter liaj vivo-danĝeroj.

Ankaŭ en ĉi tiun preĝejon li eniris laŭpove; li iris al la altaro, kaj post ioma preĝado li faris laŭ sia kutimo mallongan parolon al la popolo, pri sia amo al ili, pri sia deziro por ilia anim-savo, kaj kiel ili sin disponu por la morgaŭaj diservoj. Sin retirinte en la hejmon de la parokestro, inter la aliaj temoj, li pridemandis lin pri Renzo. Don Abbondio diris ke li estas iom vigla, iom obstina, iom kolerema junulo. Sed ĉe pli detalaj kaj precizaj demandoj, li devis respondi, ke li estas honestulo, kaj ke eĉ li mem ne povas kompreni kiel, en Milano, li povis fari ĉiujn disklaĉatajn diablaĵojn.

«Koncerne la junulinon», reparolis la kardinalo, «ĉu ŝajnas ankaŭ al vi, ke nuntempe ŝi povas sekure veni vivi en

sia hejmo?». «Nunmomente», respondis Don Abbondio, «ŝi povas veni kaj resti kiel ŝi volas: mi diras, nunmomente; sed», li aldonis suspirante, «necesus ke via eminentega moŝto restu ĉiam ĉi tie, aŭ almenaŭ proksime».

«La Sinjoro ĉiam proksimas», diris la kardinalo: «cetere, mi mem zorgos loĝigi ŝin sekure». Kaj li tuj ordonis ke morgaŭ oni sendu frumatene portliton, kun eskorto, por venigi la du virinojn al ilia hejmo.

Don Abbondio eliris tute kontenta, ke la kardinalo al li parolis pri la junul-paro, ne demandante pri lia rifuzo ilin geedzigi. – Li do nenion scias, – li diris al si mem: – Agnese silentis: mirakle! Ja veras ke ili denove intervidiĝos; sed mi donos al ŝi aliajn instrukciojn, mi donos al ŝi. – Kaj la povrulo ne sciis, ke Federigo ne tuŝis tiun temon, ĝuste ĉar li intencis al li pri tio paroli ĝin longe, en pli libera tempo; kaj ke, antaŭ ol al li diri laŭmerite, li intencis aŭskulti ankaŭ liajn rezonojn.

Sed la zorgoj de la bona prelato por meti Lucia-n en sekuran lokon jam fariĝis senutilaj: post kiam li lasis ŝin, okazis eventoj, kiujn ni devas rakonti.

La du virinoj, dum la kelkaj tagoj, kiujn ili travivis en la gastama dometo de la tajloro, jam reakiris laŭpove ĉiu sian iaman vivmanieron. Lucia tuj petis ion por labori; kaj, kiel ŝi jam faris en la monakinejo, ŝi kudris, kudris, apartiĝinte en ĉambreto, for de la okuloj de la popolo. Agnese jen eliris, jen laboris kune kun la filino. Iliaj paroloj estis des pli malĝojaj, ju pli amo-plenaj: ambaŭ estis pretaj al disiĝo; ĉar la ŝafo tute ne povus loĝi denove tiel proksime al lupejo: kaj kiu, kia estos la fino de tiu disiĝo? La estonto estis obskura, implikita: ĉefe por unu el la duopo. Agnese faradis feliĉajn konjektojn: ke fine Renzo, se nenio aĉa lin trafis, tre baldaŭ donos pri si

novaĵojn; kaj se li trovis labor-postenon kaj loĝ-lokon, se (kiel tion pridubi?) li estas firma ĉe siaj promesoj, kial ne transloĝiĝi tien? Kaj pri tiaj esperoj ŝi parolis kaj reparolis al la filino, al kiu mi ne scias, ĉu estis pli ĉagrene aŭskulti aŭ pli pene respondi. Sian grandan sekreton ŝi plu gardis en si mem; kvankam ĉagrenite pro tiu ne unua sekretumo³ rilate tiom bonan panjon; sed retenate, kvazaŭ nevenkeble, de la honto kaj de l' diversaj timoj, de ni pli supre menciitaj, ŝi prokrastis tagon post tago, nenion dirante. Ŝiaj planoj estis tute malsamaj ol tiuj de la patrino, aŭ, pli ĝuste, ŝi tute ne havis da ili; ŝi estis allasita al la Dia Providenco. Ŝi do klopodis faligi aŭ deturni tiun temon; aŭ ŝi diris, tute ĝenerale, ke ŝi ne plu havas esperon, nek deziron el tiu ĉi mondo, krom loĝi baldaŭ denove kun sia patrino; plej ofte la ploro oportune venis fin-tranĉi la vortojn.

«Ĉu vi scias kial la afero al vi ŝajnas tia?» diris Agnese: «ĉar vi multe suferis, kaj al vi ne verŝajnas, ke la afero povas ŝanĝiĝi al bono. Sed lasu ke la Sinjoro faru; kaj se... Lasu ke aperu lumeto, apenaŭ lumeto de espero; kaj tiam vi povos al mi diri, ĉu vi ne plu pensas pri io ajn». Lucia kisis la patrinon, kaj ploris.

Cetere, inter ili kaj iliaj gastigantoj tuj naskiĝis granda amikeco: kaj kie do ĝi naskiĝus, se ne inter bonfarantoj kaj bonfaratoj, kiam ambaŭ estas bonvirtaj? Speciale Agnese faris longajn babilojn kun la mastrino. La tajloro siaflanke iom plezurigis ilin per historietoj, kaj moralaj paroloj: kaj ĉefe tagmanĝe li ĉiam havis belan aferon por rakonti, pri Bovo d' Antona aŭ pri l' Patroj⁴ de l' dezerto.

³ *ne unua sekretumo*: ŝi jam prisilentis la insidojn de Don Rodrigo.

⁴ *Bova... Patroj*: roluloj el liaj legaĵoj pri kavaliroj kaj sanktuloj.

Ne for de tiu vilaĝeto somerumis alt-ranga geedza paro; Don Ferrante kaj Damo Prassede: la familia nomo restis, kiel kutime, kaŝita en la skribilo de l' anonimulo. Damo Prassede estis olda nobelino tre inklina al bonfarado: certe la plej meritplena metio, kiun homo povas praktiki; sed kiu bedaŭrinde, kiel ĉiuj aliaj profesioj, povas ankaŭ fuŝiĝi. Por fari bonon, ni devas koni ĝin; kaj, samkiel ĉiujn aliajn aferojn, ni povas ekkoni ĝin nur implikite en niaj pasioj, niaj pritaksoj, niaj ideoj; kiuj tre ofte fartas nur laŭpove. Rilate ideojn, Damo Prassede kondukis, kiel laŭdire oni konduku rilate amikojn: ŝi havis da ili malmulte, sed al ili ŝi estis tre am-ligita. Inter tiuj malmultaj ideoj, malfeliĉe troviĝis multe da misaj; kaj ĉi-lastaj ne estis al ŝi malplej karaj. Okazis do, ke ŝi al si proponas kiel bonan ion, kio ne estas tia, aŭ ke ŝi aplikas rimedojn, kiuj povas estigi malbonon, aŭ ke ŝi taksas licaj rimedojn tute ne tiajn, pro ia konfuza supozo, ke faranto pli ol deve, povas fari pli ol rajte; kaj okazis ke ŝi ne vidas la efektivan realon, aŭ vidas reala tion kio ne estas tia; kaj multe da aliaj similaj aferoj, kiuj povas okazi, kaj fakte okazas al ĉiuj, inkluzive la plej bonvirtajn; sed al Damo Prassede tro ofte, kaj plurfoje ĉiuj kune.

Aŭdinte la grandan kazon de Lucia, kaj ĉion kion ĉe-okaze oni pri ŝi diris, ŝin kaptis la scivolo vidi ŝin; kaj ŝi sendis kaleŝon kun olda brak-helpanto por venigi kaj la patrinon kaj la filinon. Ĉi-lastaj kuntiris la ŝultrojn, kaj petis la tajloron, al ili mesaĝintan, ke li eltrovu manieron por ekskuzi ŝin. Koncerne simplajn homojn, strebantajn vidi la miraklitan junulinon, la tajloro al ŝi jam faris volonte tian helpon; sed ĉi-kaze rifuzo ŝajnis al li speco de ribelo. Li faris tiom da mienoj, eligis tiom da interjekcioj, diris tiom da aferoj: kaj ke oni ne

tiele kondutu, kaj ke temas pri eminenta domo, kaj ke al senjoroj oni ne respondu nee, kaj ke tio povus konsistigi ilian feliĉon, kaj ke senjorino Damo Prassedo, krom-cetere, estas eĉ sanktulino; entute tiom da aferoj, ke Lucia devis kapitulaci: des pli ke Agnese konfirmis ĉiujn rezonojn de la tajloro per tiom da «certe, certe».

Kiam la du virinoj alvenis antaŭ la senjorino, ĉi-lastaj faris al ili grandan akcepton, kaj multege da gratuloj; demandis, konsilis: ĉion kun supereco kvazaŭ denaska, sed moderigita per tiom da humilaj esprimoj, mildigita per tiom da zorgemo, kondimentita per tiom da pieco, ke, Agnese preskaŭ tuj kaj Lucia post nemulte, iom post iom sentis sin levitaj el la prema respektemo, kiun al ili kaŭzis ĉe l' komenco tiu senjoreca aspekto; ili eĉ trovis ĝin iel alloga. Kaj por diri mallonge, Damo Prassedo, aŭdinte ke la kardinalo sin devontigis trovi al Lucia rifuĝejon, tiklite per la deziro favori kaj samtempe anticipi tiun bonan intencon, sin proponis gastigi la fraŭlinon hejme, kie, sen speciala tasko, ŝi povos laŭplaĉe helpi la ceterajn virinojn en iliaj laboroj. Kaj ŝi aldonis ke ŝi mem zorgos sciigi pri tio la monsinjoron.

Krom la klara kaj senpera bonfaro de tia gastigado, Damo Prassedo subdividis kaj celis alian, eble pli konsiderindan, laŭ ŝi; tio estas, rektigi cerbon kaj rekonduki al ĝusta vojo personon, kiu tion ege bezonas. Ĉar, ek de kiam ŝi aŭdis unuafoje paroli pri Lucia, ŝi tuj konvinkiĝis, ke junulino, kiu sin promesis edzino al ne bona ulo, al ribelulo, entute al eŝafod-evitulo, nepre havas ian difekton aŭ kaŝitan malvirton. Laŭproverbe: kvalit' de via kompani' – indikas, kia estas vi. La aspekto de Lucia al ŝi konfirmis tian konvinkon. Verdire ŝi aspektis entute bon-mora knabino; sed en ŝi estis multe por kritiki. Tia

mallecita kapeto, kun la mentono gluita al la gorĝa foso, tiaj rifuzoj respondi, aŭ respondoj tute sekaj, kvazaŭ eldevigitaj, povus ja indiki pudoron; sed certe montris multe da obstino: ne malfacilis diveni, ke tiu kapeto havas siajn apartajn ideojn. Kaj tiaj oftaj ruĝiĝoj, tia suspir-deteno... Kaj krome, granda okul-paro, kiu al Damo Prassede tute ne plaĉis. Ŝi kredis kiel certan aferon, kvazaŭ ŝi tion ekscius el fidinda informo, ke ĉiuj malfeliĉoj de Lucia estas ĉiela puno pro ŝia amikeco kun tiu malbon-morulo, kaj averto, ke ŝi tute de li disiĝu; kaj, ĉar tiel stasis la situacio, ŝi al si proponis kunlabori al tiel bona celo. Ĉar, kiel ŝi ofte diris al aliuloj kaj al si mem, ŝia tuta klopodado celis favori la ĉielajn volojn: sed ofte ŝi faris konfuzegon, nome taksi ĉielo sian propran cerbon. Tamen, pri ĉi tiu dua intenco de ni menciita, ŝi tute evitis elmontri eĉ minimuman indicon. Unu el ŝiaj principoj estis ke, por sukcese bonfari al homoj, plejofte plej gravas ne komuniki al ili sian planon.

La panjo kaj la filino sin rigardis reciproke en la vizaĝon. Ĉe la ĉagrena neceso disiĝi, la propono ŝajnis al ambaŭ akceptinda, almenaŭ pro tio ke la vilao estis proksima al ilia vilaĝo: tiel ke, en plej aĉa kazo, ili povos proksimiĝi kaj renkontiĝi je l' venonta somerumo. Vidinte la konsenton unu en la okuloj de la alia, ambaŭ sin turnis al Damo Prassede kun la dank-esprimo de akceptantoj. Ŝi renovigis la afablaĵojn kaj promesojn, kaj diris, ke ŝi tuj sendos leteron por prezenti al la monsinjoro.

Post la foriro de l' virinoj, ŝi komisiis ties redakton al Don Ferrante, kiun ŝi, pro tio ke li estis literatoro, kiel ni diros pli detale, uzis kiel sekretarion en gravegaj okazoj. Ĉar la nuna estis ĝuste tia, Don Ferrante elpremis sian tutan erudicion, kaj,

liverante al la edzino la malneton por kopii, li varme al ŝi rekomendis la ortografion; kiu estis unu el la multaj aferoj de li studitaj, kaj el la malmultaj super kiuj li rajtis komandi en tiu domo. Damo Prassede kopiis diligentege, kaj sendis la leteron al la domo de la tajloro. Tio ĉi okazis du aŭ tri tagojn antaŭ kiam la kardinalo sendis la portliton por reveturigi la virinojn al ilia vilaĝo.

Alveninte, ili eliris de la portlito ĉe la parokestrejo, kie troviĝis la kardinalo. Estis ordonite enkonduki ilin senprokraste: la kapelano, kiu vidis ilin kiel unua, plenumis la ordonon, retenante ilin nur kiom necese, por doni al ili tute rapide iom da instrukcio, kiel ceremonii kun la monsinjoro, kaj kiel lin titoli; ĉi tion li faris ĉiufoje kiam li tion povis kaŝe de li. La povra kapelano daŭre turmentiĝis, vidante la misordon regantan ĉirkaŭ la kardinalo ĉi-teme: «ĉio» li diris al la aliaj kardinalanoj «pro l' troa bonkoreco de tia benata viro; pro lia tro granda familiareco». Kaj li rakontis, ke pli ol unufoje li eĉ aŭdis al li respondi: jes, pastro⁵; ne, pastro!

En tiu momento la kardinalo estis traktanta pri l' aferoj de la paroko kun Don Abbondio, tiel ke ĉi-lasto ne povis, kiel li deziris, ankaŭ li mem instrukcii la virinojn. Nur pasante apud ili, dum li eliris, kaj ili aliris, li povis al ili okulumi, por gesti, ke li kontentas pri ili, kaj ke ili laŭdeve daŭrigu silenti.

Post la unuaj akcepto-vortoj unuflanke, kaj la unuaj kliniĝoj aliflanke, Agnese eligis el la sino la leteron, kaj ĝin prezentis al la kardinalo, dirante: «Ĝi estas de sinjorino Damo Prassede, kiu diras, ke ŝi tre multe konas vian eminentegan moŝton, monsinjoro; kiel kompreneble ĉiuj grandaj senjoroj certe konas sin reciproke. Kiam vi legos, vi vidos».

⁵ *pastro*: laŭ la kapelano, tro modesta titolo rilate altrangan ekleziulon.

«Bone», diris Federigo, leginte, kaj elpremite la sencon el la floraĵoj de Don Ferrante. Li konis tiun domon, kiom sufiĉis, por certi ke Lucia estas tien invitita bonintence, kaj ke tie ŝi estos sekura kontraŭ la insidoj kaj la perforto de ŝia persekutanto. Ni havas nenian faktan sciigon koncerne lian opinion pri la cerbo de Damo Prasede. Verŝajne ŝi ne estis la persono, kiun li elektus por tiu celo, sed kiel ni diris aŭ subkomprenigis aliloke, li ne kutimis malfari alies aferojn, por ilin refari pli bone.

«Akceptu pace ankaŭ ĉi tiun disiĝon, kaj la necertecon, en kiu vi troviĝas», li aldonis: «fidu, ke tio baldaŭ finiĝos, kaj ke la Sinjoro volas konduki la aferojn al la celo, al kiu ŝajnas ke li direktis ilin; sed kreu certe, ke, kion ajn Li volos, tio estos plej bona por vi». Li diris speciale al Lucia aliajn amoplenajn admonojn, al ambaŭ li aldonis aliajn konsolojn; li benis ilin, kaj forsalutis ilin. Apenaŭ elirinte, ili trovis sin premataj de svarmo da amikoj kaj amikinoj, de la tuta komunumo, oni povus diri, kiu atendis ilin, kaj kondukis ilin hejmen, kvazaŭ triumfe. Ĉiuj virinoj konkuris je gratuloj, bedaŭroj, demandoj; kaj ĉiuj elkriis ĉagrenite, aŭdante ke Lucia foriros morgaŭ. La viroj konkuris proponante helpojn; ĉiu volus tiunokte gardostari antaŭ la domo. Pri ĉi-lasta afero nia anonimulo taksis oportune komponi proverbon: se vi helpon ne bezonas, mil helpantoj sin proponas.

Tiom da akceptoj konfuzis kaj konsternis Lucia-n: Agnese ne embarasiĝis pro tiaj bagateloj. Sed entute ili bonfaris ankaŭ al Lucia, iom distrante ŝin el la pensoj kaj memoroj, kiuj bedaŭrinde, eĉ meze de tia bruado, en ŝi vekigis, ĉe tiu sojlo, en tiuj ĉambretoj, ĉe l' vido de ĉia objekto.

Ĉe l' bato de l' sonorilo, kiu anoncis la baldaŭan komencon de l' Di-servoj, ĉiuj ekiris al la preĝejo, kaj tio estis por niaj virinoj alia triumfa promeno.

Post la fino de l' Di-servoj, Don Abbondio jam alrapidis kontroli, ĉu Perpetua ĉion disponigis por la tagmanĝo, kiam lin vokis la kardinalo. Li tuj prezentiĝis al la grava gasto, kiu, post kiam li proksimiĝis, komencis: «sinjoro parokestro»; kaj tiujn vortojn li diris tiamaniere, ke oni komprenu, ke temas pri komenco de longa, serioza parolo: «sinjoro parokestro, kial vi ne edzinigis tiun povran Lucia-n kun ŝia promesita edzo?».- Ĉi-matene ili malplenigis la sakon⁶, – pensis Don Abbondio; kaj li respondis grumblante: «via eminentega monsinjora moŝto supozeble aŭdis pri la renversegoj estiĝintaj ĉe tiu afero: estis konfuzo tia, ke eĉ hodiaŭ ne eblas havi pri ili klaran ideon: kiel eĉ via eminentega moŝto mem povas konkludi, ke la fraŭlino, post tiom da akcidentoj, estas ĉi tie preskaŭ mirakle; kaj la fraŭlo, post aliaj akcidentoj, oni ne scias, kie li estas».

«Mi demandas», reparolis la kardinalo, «ĉu veras ke vi, antaŭ ĉiuj ĉi-okazoj, vi, petite, rifuzis celebri la geedziĝon en la fiksita tago; kaj kial».

«Verdire... se via eminentega moŝto scius... kiajn ordonegojn... kiajn terurajn ordonojn mi ricevis, ke mi ne parolu...». Kaj li interrompis senkonklude, kun teniĝo, kiu respekteme komprenigu, ke estus maldiskrete scivoli pli-multe.

«Sed!» diris la kardinalo, kun voĉo kaj mieno eksterkutime gravaj: «via episkopo mem, pro sia devo kaj por via pravigo, volas ekscii de vi, kial vi ne faris tion, kio laŭ

⁶ *malplenigis la sakon*: malkaŝis la sekreton.

regula procedo estis via devo fari».

«Monsinjoro», diris Don Abbondio, nanigante sin mem, «mi tute ne intencis diri... Sed al mi ŝajnis, ke ĉar temas pri aferoj implikitaj, aferoj malnovaj kaj senrimedaj, estus tute senutile remiksi la kaĉon... Tamen, tamen, mi diras... mi ja scias ke via moŝto ne intencas perfidi sian povran parokestron. Ĉar vi ja vidas, monsinjoro; via eminentega moŝto ne povas esti ĉiuloke; kaj mi restas ĉi tie senprotekta... Tamen, ĉar vi tion al mi ordonas, mi diros, mi diros ĉion».

«Diru: mi nur deziras vin trovi senkulpa».

Tiam Don Abbondio komencis rakonti la doloran historion; sed li prisilentis la ĉefan nomon, kaj ĝin anstataŭis, dirante: iu granda senjoro: ĝi estis la nura singardeto ebla en tia malfacila momento.

«Kaj ĉu vi ne havis alian motivon?» demandis la kardinalo, post kiam Don Abbondio finis sian diron.

«Sed eble mi ne klarigis sufiĉe», respondis ĉi-lasto: «sub morto-minaco oni al mi ordonegis ne fari tiun geedzigon».

«Kaj ĉu tio al vi ŝajnas sufiĉa motivo, por ne plenumi klaran devon?».

«Mian devon mi ĉiam klopodis plenumi, eĉ kun mia grava malkomforto, sed kiam temas pri la vivo...».

«Kaj kiam vi prezentis vin al la Eklezio», diris Federigo kun eĉ pli grava emfazo, «por surpreni ĉi tian oficon, ĉu la Eklezio al vi donis garantion pri la vivo? Ĉu eble ĝi al vi diris, ke la devoj ligitaj kun la ofico estas liberaj el ĉia malhelpo, imunaj el ĉia danĝero? Aŭ ĉu eble ĝi al vi diris, ke, kie komenciĝas danĝero, tie finiĝas devo? Aŭ ĉu ĝi ne diris al vi specife la malon? Ĉu ĝi ne avertis vin, ke ĝi sendas vin kiel ŝafidon inter lupoj? Ĉu vi ne sciis, ke ekzistas perfortuloj, kiuj

povus malŝati tion, kio estas al vi ordonita? Ĉu Tiu, de Kiu ni ricevis la doktrinon kaj la ekzemplon,⁷ laŭ Kies imito ni lasas nin nomiĝi kaj nomas nin mem paŝtistoj, ĉu, venante surteren por paŝtisti, metis kiel kondiĉon la savon de sia vivo? Kaj por ĝin savi, por ĝin gardi, mi diras, kelktage plilonge surtere, perfidante kaj karitaton kaj devon, ĉu necesis la sankt-oleado, la man-surmeto⁸, la graco de pastreco? Sufiĉas la mondumo, por havigi ĉi tian virton, por instrui ĉi tian doktrinon. Kion mi diras? honton! Eĉ la mondo ĝin rifuzas: eĉ la mondo havas siajn leĝojn, kiuj preskribas malbonon kiel bonon; ankaŭ ĝi mem havas sian evangelion, evangelion de orgojlo kaj malamo; kaj ĝi malpermesas, ke oni diru, ke amo al la vivo estas sufiĉa kialo por malobservi ties ordonojn. Ĝi tion malpermesas, kaj estas obeata. Kaj kio pri ni! ni, filoj kaj anoncantoj de la Dia promeso! Kio estus la Eklezio, se ĉi-via lingvaĵo apartenus al ĉiuj pastroj? Kie estus nun la Eklezio, se ĝi sin estus prezentinta en la mondo kun tiaj doktrinoj?

Don Abbondio staris kun mallevita kapo: inter tiaj argumentoj, lia spirito stasis kiel kokido inter falkaj ungegoj, tenantaj ĝin levita en nekonata regiono, en aero, kian ĝi neniam spiris. Vidante, ke ion ajn oni devas respondi, li diris, kun afekta submetiĝo: «Eminentega monsinjoro, povas esti, ke mi malpravas. Se la vivo ne devas valori, mi ne scias kion diri. Sed kiam la afero koncernas homojn, kiuj havas forton kaj tute ne volas aŭskulti rezonojn, mi ne scias, kion oni povas gajni, eĉ se kondukti brave. Temas pri senjoro, kun kiu oni povas nek

⁷ *la ekzemplon*: al la timema Don Abbondio la kardinalo prezentas kiel modelon Jesuon, la bonan paŝtiston, kiu oferis sian vivon por sia grego, t.e. por la homaro.

⁸ *sankt-oleado... man-surmeto*: ritoj por estigi pastron.

gajni nek egalpoenti».

«Kaj ĉu vi ne scias, ke suferi por justeco estas nia venko? Kaj se vi ne scias ĉi tion, kion do vi predikas? Pri kio vi estas majstro? Kio do estas la *bona sciigo*⁹, kiun vi anoncas al la malriĉuloj? Kiu do postulas, ke vi venku la forton per la forto? Iun tagon certe oni ne demandos vin, ĉu vi sukcesis trudi al potenculoj agi laŭdeve; ĉar por tio vi ricevis nek mision nek rimedon. Sed oni ja demandos vin, ĉu vi uzis la rimedojn, kiujn vi disponis, por fari tion, kio estis al vi preskribita, eĉ kiam oni aŭdacus malpermesi tion al vi».

– Kuriozaj tiaj ĉi sanktuloj, – dume pensis Don Abbondio: – entute, se elpremi la sukcon, al li pli multe gravas la amindumoj de junul-paro, ol la vivo de povra pastro. – Kaj siaflanke li volonte kontentus ke la parolo finiĝu ĉi tie; sed li vidis, ke la kardinalo, ĉe ĉiu paŭzo, atendas respondon: konfeson, aŭ apologion,¹⁰ ion ajn entute.

«Mi rediras, monsinjoro», li do respondis, «ke eble malpravas mi mem... Ne eblas al si doni kuraĝon, se oni ĝin ne havas».

«Kaj kial do, mi povus al vi diri, vi devigis vin al ofico, kiu al vi ordonas bataladi kontraŭ la mondumaj pasioj? Sed kial, mi prefere al vi diros, kial vi ne pensas, ke se en tiu ĉi ofico, kiel ajn vi ĝin surpronis, vi bezonas kuraĝon, por plenumi viajn devojn, ekzistas Tiu, Kiu la kuraĝon nepre al vi donos, se vi ĝin preĝ-petos? Ĉu vi kredas, ke la milionoj da martiroj havis kuraĝon laŭnature? Ke laŭnature ili taksis neniaĵo sian vivon? Tiom da knaboj komencantaj la vivon ĝui, tiom da olduloj, kutimaj bedaŭri, ke ĝi baldaŭ finiĝos, tiom da

⁹ *bona sciigo*: ĝi estas la etimologia signifo de *evangelio*.

¹⁰ *apologion*: senkulpiĝan pledon.

fraŭlinoj, tiom da edzinoj, da patrinoj? Ĉiuj kuraĝis; ĉar la kuraĝo necesis, kaj ili fidis. Konsciante vian malfortikecon kaj viajn devojn, ĉu vi strebis prepari vin mem al la malfacilaj elpaŝoj, en kiuj vi povos troviĝi, en kiuj vi fakte troviĝis? Ha! se dum tiom da jaroj de paŝtista oficado, vi amis (kaj kiel vi ne amus?) vian gregon, se vi al ĝi dediĉis vian koron, viajn zorgojn, vian plezuriĝon, la kuraĝo ne povus al vi manki ĉebezono: amo estas maltima. Nu, se vi amis la konfiditojn al viaj spiritaj zorgoj, tiujn kiujn vi nomas filetoj; vidante du el ili minacitaj kune kun vi, ha certe! samkiel la karna malforteco tim-tremigis vin pri vi mem, la karitato certe tim-tremigis vin pri ili. Vi devus humiligi vin pro tiu unua timo, frukto de via spirita mizero; kaj preĝ-peti forton por ĝin venki, ĝin forpeli, ĉar ĝi estis tento: sed la sanktan kaj noblan timon por la aliuloj, por viaj spiritaj filetoj, supozeble vi aŭskultis: eble ĝi ne lasis al vi pacon, ĝi ekscitis vin, ĝi devigus vin pensi, fari ĉion eblan, por rimedi je la danĝero, kiu ilin minacis... Kion al vi inspiris la timo, la amo? Kion vi faris por ili? Kion vi pensis?».

Kaj li eksilentis, kun sinteno de l' homo, kiu atendas respondon.

XXVI

Don Abbondio, kiu ĉe antaŭaj malpli precizaj demandoj iel strebis ion respondi, ĉe tia ĉi lasta restis tute senparola. Kaj verdire ankaŭ ni mem, kun ĉi-manuskripto antaŭ la okuloj, kun la skribilo en-mane, devante kontraŭstari nur frazojn, kaj nenion timi krom la kritikojn de niaj legantoj; eĉ ni mem iel malinklinas daŭrigi: ni trovas iel stranga tian ĉi senpenan elmeton de belaj preceptoj pri braveco kaj karitato, pri efektiva klopodado por aliuloj, pri senlima sinofero. Sed, pensante, ke tiaĵojn diris homo, kiu ankaŭ praktikis ilin, ni kuraĝe daŭrigas.

«Ĉu vi ne respondas?» reparolis la kardinalo. «Ha, se vi estus farinta via-flanke tion kion la karitato, kion la devo postulis; vi nun ne malhavas respondon, sendepende de la rezultoj de viaj faroj. Vi mem do vidas, kion vi faris. Vi obeis maljustecon, neglektante la preskribojn de l' devo. Vi tute obeis ĝin: maljusteco sin malkaŝis al vi, por al vi ordonegi sian deziron; sed ĝi volis resti kaŝita al povanto ŝirmiĝi kontraŭ ĝi, kaj gardi sin; ĝi volis ke ne okazu bruoj, ĝi volis sekreton, por tute komforte maturigi siajn insidajn aŭ perfortajn planojn; ĝi al vi ordonis malobservon kaj silenton: vi malobservis kaj mutis. Nun mi demandas vin, ĉu vi ne faris eĉ pli; vi diru al mi, ĉu vere vi inventis pretekstojn por pravigi vian rifuzon, por kaŝi ties veran motivon». Kaj li haltis iomete, atendante denove respondon.

– Ankaŭ ĉi tion raportaĉis la klaĉulinoj, – pensis Don Abbondio; sed li ne montris, ke li havas ion por diri; tial la kardinalo daŭrigis: «se vere vi diris al tiuj povruoj malveron, por ilin teni en nescio, en la obskuro, en kiu la maljusteco ilin volis... Mi do devas tion kredi; al mi do nur restas ruĝiĝi kune

kun vi, kaj esperi, ke vi tion priploros kune kun mi. Vidu, kien vin kondukis tiu zorgo por ĉi-tera, baldaŭ ĉesonta vivo (ho bona Dio! kaj vi ĵus pretekstis ĝin kiel senkulpigon). Ĝi kondukis vin... vi rebatu libere ĉi-miajn vortojn, se ili al vi ŝajnas maljustaj, sed prenu ilin kiel bonfaran humiligon, se ili maljustaj ne estas... ĝi kondukis vin ĝis tio, ke vi trompis senfortulojn, vi mensogis al viaj filetoj».

– Jen kiel iras la aferoj, – diris ankoraŭ en si mem Don Abbondio: – al tiu satanaĉo, – li aludis la nenomiton, – la brakojn ĉirkaŭ-kole; rilate min, pro duona mensogeto, dirita nur por savi mian vivon, tiom da bruo. Sed temas pri superuloj; ili ĉiam pravas. Ja apartenas al mia planedo¹, ke ĉiuj ataku min; eĉ sanktuloj. – Kaj laŭt-voĉe li diris: «mi misfaris; mi komprenas ke mi misfaris; sed kion mi devus fari en tia riska situacio?».

«Kaj ĉu vi ankoraŭ demandas tion? Ĉu mi ne jam diris ĝin al vi? Kaj ĉu mi devus ĝin diri? Ami, fileto mia; ami kaj preĝi. Tiam vi sentus, ke maljusteco ja povas havi minacojn por fari, batojn por doni, sed ne ordonojn por trudi; vi estus kuniginta² laŭ la leĝo de Dio, tion kion homo volus disigi; vi estus plenuminta por tiuj malfeliĉaj senkulpuloj la oficon, kiun ili rajtis postuli de vi: pri la konsekvencoj garantiis Dio mem, ĉar oni irus laŭ lia vojo: sed ĉar vi alian vojon aliris, vi mem restas ties garantianto; kaj kun kiaj konsekvencoj! Sed, ĉu vere al vi mankis ĉiaj homaj rimedoj? Ĉu nenia eskapejo estis malfermita, se vi nur volus ĉirkaŭ-rigardi, pripensi, esplori? Nun vi scii povas, ke tiuj viaj povruloj, se ili estus geedziĝintaj, eltrovus per si mem eskapejon, ili estus disponaj

¹ *planedo*: t.e. destino, laŭ popola astrologia dirmaniero.

² *estus kuniginta*: per nupto.

rifuĝi for de l' potenculo, ili jam planis rifuĝejon. Sed eĉ sentio, ĉu vi ne elpensis, ke fine vi havas superulon? Kiel do li havus ĉi-rajton riproĉi vin pro l' malobservo de via ofico, se li ne havus ankaŭ la devon helpi vin plenumi ĝin? Kial vi ne ekpensis informi vian episkopon pri la baro, kiun fia perforto starigis kontraŭ l' plenumo de via ofico?

– La konsiloj de Perpetua! – pensis kolerete Don Abbondio, kiun, eĉ meze de tiaj paroloj, plej obsedis la bildo de tiuj bravuloj, kaj la penso ke Don Rodrigo ja vivas kaj sanas, kaj li revenos ian tagon glora, kaj triumfa, kaj furioza. Kaj kvankam tiu ĉeestanta eminentulo, tiu aspekto kaj tiu lingvaĵo lin konfuzis, kaj lin iel timigis, temis tamen pri timo, kiu ne tute regis lin, nek malebligis la ribelon de lia penso: ĉar li pensis ke finfine la kardinalo aplikas nek pafilon, nek glavon, nek bravulojn.

«Kial do vi ne pensis», li daŭrigis, «ke, se al tiuj senkulpaj insidatoj ne malfermiĝus alia rifuĝejo, ĉeestas mi mem, por ilin gastigi kaj elsavi, se ilin vi al mi direktus, se vi direktus povrajn forlasitojn al episkopo, kvazaŭ lian proprietaĵon, kvazaŭ valoran porcion, mi ne diru de lia ŝarĝo, sed de lia riĉaĵo? Kaj koncerne vin, mi mem malkvietus pri vi; mi mem devus maldormi, ĝis mi sekuros, ke eĉ ne unu haron oni al vi tordos. Ĉu mi ne povus trovi kiel, kie sekurigi vian vivon? Koncerne tiun viron, kiu tiel aŭdacis, ĉu vi kredas, ke tute ne malkreskus ties aŭdaco, se li ekscius, ke liaj maĥinacioj estas konataj for de ĉi tie, konataj de mi, kaj ke mi viglas, kaj mi rezolutas apliki via-defende ĉiajn rimedojn, kiujn mi povas disponi? Ĉu vi ne sciis ke, se veras ke la homo tro ofte promesas pli multe ol kiom li poste plenumos, ne malofte li ankaŭ minacas pli multe ol kiom li fakte atencos? Ĉu vi ne

sciis, ke maljusteco baziĝas ne nur sur sia propra forto, sed ankaŭ sur alies trokredemo kaj teruro?».

– Ĝuste la rezonoj de Perpetua, – pensis ankaŭ ĉe tio Don Abbondio, ne pripensante, ke tia konsento de lia servistino kun Federigo Borromeo pri tio, kion oni povus kaj devus fari, signifas grandan kulpigon kontraŭ li.

«Sed vi», daŭrigis kaj finis la kardinalo, «vi nenion vidis, nenion vi volis vidi krom vian portempan³ danĝeron; kiel do mirinde, ke ĝi ŝajnis al vi tia, ke vi neglektis ĉion alian?».

«Tio, ĉar mi mem vidis tiujn vizaĝaĉojn», elbuŝigis Don Abbondio; «mi mem aŭdis tiujn vortojn. Via eminentega moŝto ja bele parolas; sed oni devus esti povra pastro, kaj troviĝi en tia situacio».

Post tiuj ĉi vortoj, li tuj mordis al si la langon; li konsciiĝis, ke li tro multe cedis al koler-sento, kaj li diris interne de si mem: – Jen nun venas hajlo –. Sed, levante dubeme la rigardon, li tute miris, vidante tiun aspekton, kiun neniam li sukcesis kompreni nek diveni, vidante ĝin, mi diras, pasi el aŭtoritata kaj riproĉema graveco, al graveco pentema kaj penso-plena.

«Bedaŭrinde!» diris Federigo, «tia estas nia mizera kaj terura vivkondiĉo. Ni devas rigore postuli ĉe aliaj tion, kion nur Dio scias, ĉu ni mem pretus doni: ni devas juĝi, korekti, riproĉi; kaj nur Dio scias, kion do ni farus en sama kazo, kion do ni faris en similaj situacioj! Sed ve al mi, se mi prenus mian senfortecon kiel mezurilon de alies devo, kiel regulon de mia instruo! Kaj tamen certas ke, kune kun la instruoj, mi devas doni al aliaj la ekzemplon, ne simili al la leĝo-majstro,

³ *portempan*: kompare kun la eterna vivo, kiun la kristana kredo promesas.

kiu ŝarĝas aliulojn per pezaĵoj, kiujn ili ne kapablas elporti, kaj kiujn li mem eĉ ne unufingre tuŝus. Nu, fileto kaj frato; ĉar la misfaroj de ĉefoj estas ofte pli konataj de aliaj ol de ili mem; se vi scias ke pro timemo, pro ia singardo, mi neglektis ian devon, diru ĝin al mi libere, igu min penti; por ke tie, kie mankis la ekzemplo, riparu almenaŭ la konfeso. Libere riproĉu miajn senfortecojn; kaj tiam miaj vortoj akiros pli da valoro en mia buŝo, ĉar vi pli vive sentos, ke ili ne apartenas al mi, sed al Tiu kiu povas doni kaj al vi kaj al mi la necesan forton por plenumi tion kion ili preskribas».

– Ho kia sankta viro! sed kia turmento! – pensis Don Abbondio: – eĉ kontraŭ si mem: kondiĉe ke li esploru, elfosu, kritiku, enketu; eĉ kontraŭ si mem. – Kaj poste li diris laŭtvoĉe: «ho monsinjoro! ĉu vi ŝerce diras? Kiu do ne konas la fortan koron, la senŝancelan fervoron de via eminentega moŝto?» kaj interne de si mem li aldonis: – eĉ tro multe! –.

«Mi ne petis de vi laŭdon, kiu tremigas min», diris Federigo, «ĉar Dio ja konas miajn mankojn, kaj eĉ nur tio, kion mi mem konas, sufiĉas por min hontigi. Sed mi intencis kaj volas, ke ni ambaŭ hontu kune antaŭ Li, por kune fidi. Mi volas, pro amo al vi, ke vi komprenu kiom multe via konduto kaj via lingvaĵo kontraŭas la leĝon kiun vi ja predikas, kaj laŭ kiu vi estas juĝota».

«Ĉio falas sur min», diris Don Abbondio: «sed tiuj kiuj venis raporti, al vi ne ankaŭ diris, ke ili enŝteliĝis perfide en mian hejmon, por min surprizi, kaj fari geedziĝon kontraŭregulan».

«Ili ĝin diris, mia fileto: sed min korprenas, min deprimas tio, ke vi ankoraŭ deziras senkulpiĝi; ke vi celas senkulpiĝi, kulpigante; ke vi taksas alies kulpigo tion, kio

devus aparteni al via propra konfeso. Kiu do metis ilin, mi ne diras en la neceson, sed en la tenton fari tion? Ĉu ili provus tiun neregulan vojon, se la laŭleĝa ne estus al ili fermita? ĉu ili planus insidi la paŝtiston, se ili estus akceptitaj en liaj brakoj, se helpitaj, konsilitaj de li? ĉu ili provus surprizi lin, se li ne estus kaŝinta sin? Kaj ĉu vi ĉi tiajn homojn kulpigas? kaj ĉu vi indignas ĉar, post tiom da malfeliĉoj, kion do mi diras? ĝuste meze de l' malfeliĉo, ili unu vorton ellasis al sia, al via paŝtisto? Ke la mondo malamas apelacion de subpremato kaj plendon de afliktito, tia estas la mondo; sed kio pri ni! Kaj kia utilo por vi, se ili silentus? Ĉu estus al vi avantaĝe, se ilia afero irus netuŝite⁴ al la juĝo de Dio? Ĉu ne estas por vi plua motivo por ami ĉi tiujn homojn (kaj vi jam havas multe da motivoj), tio ke ili donis al vi oportunon aŭdi la sinceran voĉon de via episkopo, ke ili havigis al vi rimedon por pli bone konscii, kaj elpigi parton de la ŝuldo, kiun vi havas rilate ilin? Ha! eĉ se ili estus provokintaj, ofendintaj, turmentintaj vin, mi al vi dirus (kaj ĉu mi devus diri tion al vi?) ke vi amu ilin, ĝuste pro tio. Amu ilin, ĉar ili suferis, ĉar ili suferas, ĉar ili al vi apartenas, ĉar ili estas senfortaj, ĉar vi bezonas pardonon, por kies ricevo vi konsideru, kiom fortas ilia preĝado».

Don Abbondio silentis; sed ne plu temis pri tia kontraŭvola kaj senpacienca silento: li silentis, kiel homo, kiu havas pli multe por pensi ol por diri. La vortoj, kiujn li aŭdis, estis neatenditaj konsekvencoj, novaj aplikoj, tamen fontantaj el doktrino antikva kaj senkontraŭstara en lia menso. Alies malfeliĉo, de kies konsidero lin ĉiam deturnis la timo pri lia

⁴ *netuŝite*: sen la pento de Don Abbondio, kaj do sen la pardono de Dio.

propra, nun kaŭzis en li novan impreson. Kaj, eĉ se li ne sentis la tutan rimorson, kiun la kardinala prediko intencus estigi (ĉar tiu sama timo plu ĉeestis, por roli kiel pledanto), li tamen sentis iom da ĝi; li sentis ian bedaŭron pri si, kompaton pri aliuloj, miksaĵon el tenereco kaj konfuzo. Estis, se oni al ni permesas ĉi tiun komparon, kiel kandela meĉo malseka kaj taŭzita, kiu, almetite al la flamo de granda torĉo, komence fumas, ŝprucas, kraketas, estas tute nesentema; sed fine ĝi ekfajras, kaj iele-tiele brulas. Li malkaŝe kulpigus sin, li plorus, se ne ĉeestus la penso pri Don Rodrigo; tamen li sin montris tiel kortuŝita, ke la kardinalo ekvidis, ke liaj vortoj ne estis senefikaj.

«Nun», li daŭrigis, «unu rifuĝinte for de sia hejmo, la alia ĝin forlasonte, ambaŭ kun tro fortaj motivoj por for-esti, sen probable iam ajn kuniĝi ĉi tie, kaj kontentaj esperi ke Dio kunigos ilin aliloke; nun, bedaŭrinde, ili ne bezonas vin; bedaŭrinde vi ne havas okazojn, por bonfari al ili; nek nia mallonga prognozo povas malkovri estontan oportunon. Sed kiu scias, ĉu Dio, la kompto-plena, ne preparas da ili? Ha! tiajn okazojn ne maltrafu! serĉu ilin, viglu, preĝu Lin, ke Li estigu ilin».

«Mi tion ne neglektos, monsinjoro, ver-vere mi tion ne neglektos», respondis Don Abbondio, kun voĉo, kiu tiumomente estis vere elkora.

«Ha jes, mia fileto, jes!» elkriis Federigo; kaj kun amoplena digno li konkludis: «la Ĉielo scias, ĉu mi estus dezirinta fari kun vi tute alian parolon. Ni ambaŭ vivis jam longe: nur la Ĉielo scias, ĉu estis al mi peze, esti devigita ĉagreni ĉi-vian respektindan blank-hararon, kaj kiom estus al mi pli ĝojige konsoli nin reciproke koncerne niajn komunajn

zorgojn, niajn malfeliĉojn, parolante pri la beata espero⁵, al kiu ni jam estas tiel proksimaj. Al Dio plaĉu, ke la vortoj, kiujn mi ja devis uzi kun vi, utilu kaj al vi kaj al mi. Ne faru, ke Dio en tiu lasta tago⁶ postulu de mi konton, pro tio ke mi plu-lasis vin en la ofico, kiun vi tiel neglektis. Ni elaĉetu la perditan tempon: ja proksimas nokto-mezo; la Edzo nepre ne malfruos; ni tenu la lampojn fajraj⁷. Ni prezentu al Dio niajn mizerajn, malplenajn korojn, por ke Li bonvolu ilin plenigi per tiu karitato, kiu riparas la pasinton, sekurigas la estonton, timas kaj fidas, ploras kaj ĝojas, kun saĝeco; kio entute estas la virto, kiun ni bezonas».

Tion dirinte, li ekiris; kaj Don Abbondio lin sekvis.

Ĉi tie la anonimulo nin avizas, ke ĉi tiu ne estis la ununura interparolo de tiuj du homoj, nek Lucia la ununura temo de iliaj interparoloj; sed ke li limigis sian raporton al ĉi tio, por ne tro multe ekskursi for de la ĉeftemo. Kaj ke, pro la sama kialo, li ne mencias aliajn rimarkindajn aferojn diritajn de Federigo dum lia tuta vizito, nek liajn malavaraĵojn, nek la malkonkordojn pacigitaj, la malamojn antikvajn inter personoj, familioj aŭ vilaĝoj estingitaj aŭ (afero bedaŭrinde pli ofta) momente kvietigitaj, nek kelkan bravulaĉon aŭ tiraneton malsovaĝigita, aŭ dumvive aŭ portempe; ĉiujn aferojn, kiaj pli-malpli okazis en ĉiu loko de la diocezo, kie tiu eminenta homo iel pasloĝis.

Li aldonas, ke la postan matenon venis Damo Prassede,

⁵ *beata espero*: la eterna vivo laŭ la kristana kredo.

⁶ *lasta tago*: la tago de la Dia juĝo.

⁷ *nokto-mezo... Edzo... lampojn*: laŭ evangelia parabolo, kristanoj devas vigle (= kun fajraj lampoj) atendi la nekonatan momenton (= nokte), de sia morto (= kiam revenos la Edzo, t.e. la Sinjoro Jesuo).

kiel decidite, por preni Lucia-n, kaj komplimenti la kardinalon, kiu al ŝi laŭdis Lucia-n kaj ŝin varme rekomendis. Ĉi-lasta disiĝis de l' patrino, vi povas imagi kun kiaj ploroj; kaj forlasis sian dometon; ŝi duafoje adiaŭis la vilaĝon, kun tiu duobla amareco, kiun oni travivas forlasante lokon unike karan, kiu ne plu povos esti tia. Sed la adiaŭoj kun la patrino ne estis la lastaj; ĉar Damo Prassede jam diris, ke oni restos ankoraŭ kelktage en ŝia vilao, kiu ne estis tre fora; kaj Agnese promesis al la filino iri tien por ŝin viziti, kaj fari kaj reciproki pli ĉagrenan adiaŭon.

Ankaŭ la kardinalo jam estis forironta, por daŭrigi aliloke sian paŝtistan viziton, kiam alvenis kaj petis aŭdiencon la pastro de la paroko, kie situis la kastelo de l' nenomito. Enkondukite, li prezentis al li pakaĵeton kaj leteron de tiu senjoro, kun la peto akceptigi al la patrino de Lucia cent orajn eskudojn, envolvitajn en la pakaĵo, por doti la junulinon, aŭ por alia uzo, kiun ili taksos plej bona; kaj kun la mesaĝo ke, se iam ajn ili taksos, ke li povas al ili fari servon, la povra junulino bedaŭrinde ja scias, kie li loĝas; kaj ĉi tio estus por li plej ŝatata feliĉo. La kardinalo tuj venigis Agnese-n, al ŝi raportis la mesaĝon, kiun ŝi aŭdis kun grandaj kontento kaj miro; kaj li prezentis al ŝi la volvaĵon, kiun ŝi prenis sen troaj ceremonioj. «Dio rekompencu laŭ-merite tiun senjoron», ŝi diris: «kaj via eminentega moŝto bonvolu danki al li tre multe. Kaj al neniu diru tion, ĉar ĉi-vilaĝo estas tia... Pardonu, vidu; mi ja scias ke homo el via rango ne dis-klaĉas ĉi tiajn aferojn; sed... vi ja komprenas min».

Ŝi tute silente iris hejmen, enfermis sin enĉambre, malpakis la volvaĵon, kaj, kvankam jam avizite, ŝi admirege ekvidis kunaj kaj siaj tiujn multajn oraĵojn, da kiaj ŝi neniam

antaŭe vidis pli ol po unu; kaj nur tre malofte; ŝi kalkulis ilin, ŝi iomete penis, por ilin denove kun-starigi, ĉar ĉiumomente la monervico kurbiĝis kaj elglitis el ŝiaj ne-spertaj fingroj; fine, re-aranĝinte laŭpove la volvaĵon, ŝi metis ĝin en tolaĵon, faris el ĝi pakaĵon aŭ bulon, kaj zorge liginte ĝin per ŝnureto, ŝi enŝovis ĝin en angulon de sia pajlo-matraco. Dum la cetera parto de tiu tago ŝi nenion faris krom remaĉi en sia kapo kaj fari planojn por la estonto, kaj sopiri la morgaŭan tagon. Enlitiĝinte, ŝi maldormis longe, kun la penso ĉe la centopo kuŝanta sub ŝi; endormiĝinte, ŝi vidis ĝin sonĝe. Ĉe l' tagiĝo, ŝi leviĝis kaj tuj ekiris al la vilao, kie loĝis Lucia.

Ĉi-lasta siaflanke, kvankam ankoraŭ tute malinklina paroli pri la voto, estis tamen rezoluta fari klopodon, kaj malkaŝi ĝin al la patrino en tiu renkontiĝo, kiu por longa tempo verŝajne estos lasta.

Apenaŭ ili sukcesis resti solaj, Agnese, kun tute ekscitita vizaĝo, kaj samtempe kun mallaŭta voĉo, kvazaŭ ĉeestus iu, kiu ne devus aŭdi, komencis: «grandan aferon mi havas por diri al vi»; kaj al ŝi rakontis la neatenditan feliĉon.

«Dio benu lin, tiun senjoron», diris Lucia: «tiel vi havos por bonstati vi mem, kaj vi povos ankaŭ bonfari al kelkiun alia».

«Kiel?» respondis Agnese: «Ĉu vi ne vidas, kiom da aferoj ni povas fari per tiom da moneroj? Aŭdu; mi neniun alian havas krom cin, krom vin ambaŭ, mi povas diri; ĉar koncerne Renzon, ek de kiam li komencis fianĉe paroli kun vi, mi ĉiam rigardis lin mia fileto. Nur gravas, ke al li ne estu okazinta malfeliĉo, konsidere, ke li neniam donis sciigon pri si: sed he! ĉu ĉio devus iri malfeliĉe? Espereble ne, espereble. Koncerne min, mi ja ŝatus lasi miajn ostojn en mia vilaĝo; sed

nun, ĉar vi ne plu povas tie resti, kaŭze de tiu kanajlo, eĉ la nura penso havi lin proksima, al mi igis mian vilaĝon abomena: kaj, kune kun vi ambaŭ, mi pretas loĝi ĉie ajn. Mi jam antaŭe pretus veni kun vi ambaŭ ĝis la mondo-limo; kaj neniam mi ŝanĝis mian intencon; sed sen mono kiel tio eblus? Ĉu vi nun komprenas? Rilate la kelkajn monerojn kolektitajn de tiu povrulo kun tiom da peno kaj ŝparemo, venis la justico kaj forbalais ĉion; sed kompanse la Sinjoro sendis feliĉon al ni. Kiam do Renzo eltrovos la rimedon, por al ni sciigi, ĉu kaj kie li vivas, kaj kion li intencas, mi mem venos al Milano, por konduki vin; venos mi mem. Alifoje tio ŝajnus al mi granda afero; sed malfeliĉoj igas senĝenaj; ĝis Monza mi veturis, kaj do mi scias, kion signifas vojaĝi. Mi kunprenas saĝkapan viron, parencon, kiel ekzemple Alession el Maggianico: ĉar verdire en nia vilaĝo da saĝkapaj viroj ne troveblas; mi venas kun li; la elspezon ja pagas ni mem, kaj... ĉu vi komprenas?».

Sed vidante, ke Lucia, anstataŭ entuziasmiĝi, pli kaj pli korpremiĝis, kaj nur elmontris sen-ĝojan tenerecon, ŝi stumpigis sian parolon kaj diris: «sed kion vi havas? ĉu vi ne konsentas?».

«Povra panjo!» elkriis Lucia, ĵetante unu brakon ĉirkaŭ ŝia kolo, kaj kaŝante la vizaĝon en ŝia brusto.

«Kio do estas?» denove demandis angor-plene la patrino.

«Mi estus devinta al vi diri ĝin antaŭe», respondis Lucia, levante la vizaĝon, kaj forviŝante la larmojn; «sed mi neniam kuraĝis: kompatu min».

«Sed vi diru do».

«Mi ne plu povas esti edzino de tiu povrulo!».

«Kiel? kiel?».

Lucia, kun mallevita kapo, kun anhela brusto, kun sen-

ploraj larmoj, kiel rakontante aferon tute ne ŝanĝeblan, eĉ se malplaĉan, malkaŝis la voton; kaj samtempe, kunmetante la manojn, denove pardon-petis la patrinon, ke ĝis tiam ŝi tion prisilentis; ŝi petegis ŝin, al tute neniuj vivanta homo raporti ĉi-tion, kaj helpi ŝin plenumi sian promeson.

Agnese restis mirigita kaj konsternita. Ŝi volus indigni pro tio ke ŝi prisilentis al ŝi; sed la pezaj pensoj pri tiu kazo sufokis ŝian personan ĉagrenon; ŝi volus al ŝi diri: kion do vi faris? sed ŝajnis al ŝi, ke tio signifas indignon kontraŭ la Ĉielo: des pli ke Lucia denove bildigis per plej vivaj farboj tiun nokton, la nigran afliktegon kaj la neatenditan liberiĝon, inter kiuj la promeso estis farita tiel eksplicite kaj solene. Dume aperis en la menso de Agnese ekzemploj, kiujn ŝi plurfoje aŭdis, kaj ŝi mem rakontis al la filino, pri strangaj kaj teruraj punoj, kiuj trafis vot-rompintojn. Post kelkmomenta kvazaŭa stuporo, ŝi diris: «kaj nun, kion vi faros?».

«Nun», respondis Lucia, «al la Sinjoro apartenas zorgi; al la Sinjoro kaj al la Madono. Mi konfidis min en iliajn manojn: ĝis nun ili ne forlasis min; ili ne forlasos min nun, kiam... La graco, kiun mi petas de la Sinjoro por mi, la ununura graco, post la anim-savo, estas, ke Li revenigu min kun vi; kaj li donacos ĝin al mi, jes, li donacos ĝin. Tiun tagon... en tiu kaleŝo... ha sanktega Virgulino!... tiuj viroj!... kiu al mi dirus, ke ili kondukos min al la viro, kiu la postan tagon kondukos min al vi?».

«Sed kial ne tuj paroli pri tio al via patrino!» diris Agnese kun kolereto mildigita de amsento kaj kompatato.

«Kompatu min; mi ne kuraĝis... kaj kion utilis aflikti vin iom antaŭe?».

«Kaj kio pri Renzo?» diris Agnese, balancante la kapon.

«Ha!» elkriis Lucia, skuante sin, «pri tiu povrulo mi ne plu devas pripensi. Ja videblas, ke ne estis destinite... Vi vidas: ŝajnas, ke la Sinjoro ja volis nin teni disaj. Kaj kiu scias...? sed ne, ne: Li mem supozeble protektis lin kontraŭ danĝeroj, kaj igos lin eĉ pli feliĉa, sen mi».

«Kaj tamen», reparolis Agnese, «se vi ne estus liginta vin por ĉiam⁸, kaj se neniam malfeliĉo trafis Renzon, por ceteraj problemoj mi ja rimedus per tiu mono».

«Sed tiu mono», replikis Lucia, «ĉu al ni venus, se mi ne travivus tian nokton? La Sinjoro mem volis, ke ĉio okazu tiele: fariĝu Lia volo». Kaj ŝia parolo dronis en ploro.

Ĉe tiu neatendita argumento, Agnese restis en-pensa. Post kelke da momentoj, Lucia, retenante la singultojn, reparolis: «nun, ĉar la afero estas farita, oni devas konformiĝi volonte; kaj vi, povra panjo, vi povas helpi min, unue preĝante la Sinjoron por via povra filino, kaj due... ja necesas, ke tiu povrulo eksciu. Vi mem zorgu, faru al mi ankaŭ ĉi tiun karitatan faron: ĉar vi ja povas tion zorgi. Kiam vi ekscios, kie do li estas, skribigu al li, vi trovu viron... ĝuste vian kuzon Alessio, kiu estas homo prudenta kaj karitata, kaj ĉiam amis nin, kaj ne klaĉos: igu lin skribi, kiel disvolviĝis la afero, kie mi troviĝis, kiel mi suferis, kaj ke Dio volis tiele, kaj ke li pacigu sian koron, kaj ke mi tute neniam povos aparteni al iu ajn. Kaj komprenigi al li la aferon delikate, kaj klarigi al li ke mi promesis, ke mi faris ĝuste voton. Kiam li ekscios, ke mi promesis al la Madono... li ĉiam estis Dio-tima. Kaj vi, kiam unuafoje vi ekhavos pri li sciigojn, skribigu al mi, sciigu al mi, ke li bonfartas; kaj poste... nenion plu sciigu al mi».

Agnese, tute kortuŝite, certigis la filinon, ke ĉio fariĝos

⁸ *liginta*: per voto.

laŭ ŝia deziro.

«Alian aferon mi volas al vi diri», reparolis Lucia: «se tiu povrulo ne estus malfeliĉe pensinta pri mi, lin ne trafus tio, kio lin trafis. Li estas vaga tra la mondo; oni ĉesigis lian laboron; oni forrabis lian havaĵon, la ŝparaĵojn, kiujn li, kompatinda, estis kolektinta, vi ja scias por kio⁹... Kaj ni havas tiom da mono! Ho panjo! ĉar la Sinjoro al ni sendis tiom da riĉaĵo, kaj vi vere konsideris tiun povrulon kiel vian... jes, vian fileton, ho! dividu ĝin kaj disponu duonon por li: ĉar Dio certe ne forlasos nin. Serĉu fidindan okazon, kaj sendu ĝin al li, ĉar nur Dio scias kiom li ĝin bezonas!».

«Nu, kion vi kredas?» respondis Agnese: «mi vere sendos ĝin al li. Povra junulo! Kial do, vi pensas, ke mi estis tiel kontenta pro tiuj moneroj? Sed...! mi venis ĉi tien tute kontenta pro vi ambaŭ. Sufiĉe, mi ilin sendos al li, povra Renzo! sed ankaŭ li mem... mi scias kion mi aludas: moneroj certe plezurigas bezonulon; sed ne ili grasigos lin».

Lucia dankis la patrinon pro ŝia tuja kaj malavara konsento, kun tiaj dankemo kaj amemo, ke eventuala observanto komprenus, ke ŝia koro estas ankoraŭ strikte ligita kun Renzo, eble pli multe ol kiom ŝi mem kredis.

«Kaj sen vi, kion faros mi, povrulino?», diris Agnese, ankaŭ ŝi mem plorante.

«Kaj kion mi sen vi, povra panjo? kaj en hejmo de fremduloj? kaj tie for, en Milano...! Sed la Sinjoro estos kun ni ambaŭ; kaj pli poste li rekunigos nin. Post ok aŭ naŭ monatoj, ni revidos nin; kaj ĝis tiu dato, kaj, espereble, eĉ antaŭe, Li aranĝos la aferojn, por kunigi nin denove. Ni lasu, ke Li mem faru. Ĉi tiun gracon mi ĉiam petos de la Madono. Se mi havus

⁹ *por kio*: por edziĝi.

ion alian por al ŝi oferi, mi oferus ĝin; sed ŝi estas tiom kompatema, ke ŝi propetos ĝin senkompense».

Kun ĉi tiuj kaj aliaj similaj plurfoje ripetitaj plendoj kaj konsoloj, bedaŭroj kaj rezignacioj, kun multe da rekomendoj kaj promesoj tute prisilenti, kun multe da larmoj, post longaj kaj denovaj brakumoj, la du virinoj disiĝis, reciproke promesante revidiĝi ne pli malfrue ol la venonta aŭtuno; kvazaŭ la efektivigo dependus de ili, kiel tamen oni ĉiam faras en tiaj kazoj.

Dume pasis multe da tempo, kaj Agnese ricevis nenian sciigojn pri Renzo. Nek leteroj nek mesaĝoj venis liaflanke: el ĉiuj en la vilaĝo aŭ la ĉirkaŭaĵoj, kiujn ŝi sukcesis pridemandi, neniu sciis plimulte ol ŝi mem.

Kaj ne nur ŝi mem esploris vane: kardinalo Federigo, kiu ne por komplimento promesis al la povraj virinoj, ke li intencas kolekti sciigojn pri l' povra junulo, fakte estis tuj sendinta leteron, por informojn ricevi. Reveninte al Milano el la paŝtista vizito, li ricevis la respondon, en kiu oni al li diris, ke ne estis trovita adreso de la menciita subjekto; ke verdire li loĝis iomtempe hejme de parenco, en difinita vilaĝo, kie li ne kaŭzis pri si klaĉojn; sed iumatene li subite malaperis, kaj tiu parenco mem ne sciis, kio al li okazis, kaj li povis nur raporti fantaziajn kaj kontraŭdirajn onidirojn, laŭ kiuj la junulo armeaniĝis en Oriento, transiris al Germanujo, pereis vadante riveron; kaj ke oni ne neglektos vigli, ĉu oni eventuale povus ekscii ion pli pozitivan, por tuj ĝin komuniki al lia eminentega kaj respektindega moŝto.

Pli poste tiuj kaj aliaj onidiroj disvastiĝis ankaŭ en la teritorio de Lecco, kaj tial atingis ankaŭ la orelojn de Agnese. La povra virino faris ĉian klopodon, por al si klarigi, kiu el ili

estas verdira, por atingi la fonton de ĉiu el ili, sed ŝi neniam sukcesis trovi pli multe ol tiu *oni diras*, kiu ankoraŭ nuntempe sufiĉas por atesti multe da aferoj. Foje, tuj kiam oni al ŝi rakontis iun onidiron, venis alia, kaj al ŝi diris, ke ĝi tute malveras; por kompanse al ŝi rakonti alian, same strangan aŭ sinistran. Ĉiuj senbazaj klaĉoj: jen la fakto.

La hispana guberniestro de Milano kaj ĝenerala kapitano en Italujo, Don Gonzalo Fernandez de Cordova, jam faris grandan bruon ĉe l' sinjoro diplomato de Venecio en Milano, ĉar krimulo, publika rabisto, iniciatinto de disrabado kaj murdado, la fi-fama Lorenzo Tramaglino kiu, jam kaptite de la justico, instigis ribelon por liberiĝi, estas akceptita kaj gastigata en la teritorio de Bergamo. La diplomato respondis, ke la afero estas por li nova, kaj ke li skribos al Venecio, por disponigi al lia eminenta moŝto konvenan klarigon.

En Venecio oni principe favoris kaj subtenis la inklinon de la Milaniaj silko-laboristoj almigri en la teritorion de Bergamo, kaj ĉi-cele oni tie havigis al ili multe da avantaĝoj kaj ĉefe tiun, sen kiu ĉio alia estas nenio, nome sekurecon. Tamen ĉar laŭproverbe, ĉe du grandaj konfliktantoj, ĝuas tria profitanto; jen Bortolo ricevis, ne sciate de kiu, konfidencan averton, ke Renzo ne bonfartas en tiu vilaĝo, kaj estus por li pli bone, se li enirus alian fabrikon, ŝanĝante portempe eĉ sian nomon. Bortolo komprenis la aludon, nenion alian demandis, rapidis diri al la kuzo la aferon, surĉariĝis kun li, kaj veturigis lin al alia ŝpinejo, distanca eble dek kvin mejlojn, kaj prezentis lin sub la nomo Antonio Rivolta, al la mastro, lia longtempa konato, kaj ankaŭ li mem naskita en Milano. Malgraŭ la magra jaro, tiu mastro ne bezonis insiston, por dungi laboriston, kiun sperta honestulo al li rekomendis kiel

honestan kaj lertan. Kaj ĉe l' provo, li tute plezuriĝis pro l' dungo; escepte ke, ĉe l' komenco, al li ŝajnis ke la junulo estas iom ventkapa, ĉar kiam oni vokis: Antonio! plej-ofte li ne respondis.

Post ne multe, el Venecio atingis la kapitanon de Bergamo milda ordono, kolekti kaj transdoni sciigojn, ĉu en lia jurisdikcio, kaj precipe en tiu difinita vilaĝo, troviĝas tiu difinita subjekto. La kapitano, diligente esplorinte, laŭ sia kompreno pri l' postulo, transdonis negativan respondon, kiun oni transsendis al la diplomato en Milano, por transdoni al la grand-kanceliero, kiu povos ĝin transdoni al Don Gonzalo Fernandez de Cordova.

Sed ne mankis scivoluloj, kiuj volus ekscii ĉe Bortolo, kial tiu junulo ne plu ĉeestas, kaj kien li foriris. Al la unua demando Bortolo respondis: «ne-sciate! li malaperis». Kaj por resendi trankvilaj la plej insistemajn, sen suspektigi pri la vera okazintaĵo, li taksis oportune regali ilin jen per unu jen per alia el la sciigoj, kiujn ni raportis pli supre: tamen kiel aferojn necertajn, onidirojn kiujn ankaŭ li mem aŭdis, sen pozitiva pruvo.

Sed kiam la demando estis al li farita komisie de la kardinalo, sen nomi lin, kaj kun elmonro de graveco kaj mistero, komprenigante ke la demando estas enorme de granda eminentulo, Bortolo des pli suspektis, kaj taksis necese respondi laŭkutime; kaj eĉ plie: ĉar temis pri granda eminentulo, li donis sume ĉiujn sciigojn, kiujn li estis elpensinta po unu en tiuj diversaj okazoj.

Oni ne kredu tamen, ke senjoro tia, kia Don Gonzalo, vere intencis persekuti la povran montaranan silko-ŝpiniston; ke eble informite pri l' malrespekto lia-rilate, kaj pri la vortaĉoj

de li dicitaj rilate lian maŭran reĝon katenitan ĉe l' kolo, li volus elvenĝi; aŭ ke li kredis lin tiom danĝera, por persekuti lin eĉ eksterlande, ke li ne volis ke li vivu eĉ malproksime, kiel la Romia senato rilate Hanibalon. Don Gonzalo havis en la kapo tro multajn kaj tro grandajn aferojn, por tiom zorgi pri la Renzo-afero; kaj se ŝajnis, ke li zorgas, tio estiĝis el kurioza hazarda koincido de cirkonstancoj, per kiuj la povrulo, ne volante, ne sciante, nek tiam nek iam ajn, troviĝis ligita per tute maldika kaj nevidebla fadeneto kun tiuj tro multaj kaj tro grandaj aferoj.

XXVII

Jam pli ol unufoje ni havis oportunon mencii la tiam bolantan militon por la heredo de la ŝtatoj de duko Vincenzo Gonzaga la 2-a; sed ĉiufoje tio okazis en tre urĝaj momentoj: tiel ke neniam ni povis fari pli ol preterkuran aludon. Sed nun la kompreno de nia rakonto postulas pli detalajn sciigojn. Temas pri aferoj, kiujn fakuloj pri historio nepre konas; sed ĉar ni devas pro ĝusta memtakso supozi, ke ĉi tiun verkon povos legi nur malkleruloj,¹ ne malkonvenos diri ĉi tie, kiom sufiĉos por havigi al eventuala bezonanto skizan informon.

Ni jam diris ke, ĉe l' morto de tiu duko, la unua kandidato laŭ familia hered-linio, Carlo Gonzaga, ĉefmembro de la flank-branĉo trans-plantita en Francujon, kie ĝi posedis la duk-landojn Nevers kaj Rhétel, marŝis, por okupi Mantova-n; kaj nun ni aldonas: ankaŭ Monferraton, ĉar pro urĝo ni tiam forgesis ĝin en la skribilo. La kortego de Madrido, kiu tute volus (ankaŭ ĉi tion ni jam diris) ekskluzivi la novan princon el tiuj du feŭdoj, kaj por tio bezonis pravigan rezonon (ĉar senpravaj militoj estus maljustaj) sin deklaris praviganto, rilate al Mantova, de l' pretendoj de alia Gonzaga-gentano, nome Ferrante, princo de Guastalla; kaj rilate al Monferrato, de Carlo Emanuele la 1-a, duko de Savojo, kaj Margherita Gonzaga, dukino vidvino de Loreno. Don Gonzalo, kiu apartenis al la gento de la grand-kapitano², kaj havis ties bapto-nomon, kaj jam faris militon en Flandrujo, deziregante

¹ *malkleruloj*: malgraŭ la romantika teorio, laŭ kiu la literaturo celu al la popolo, ĉi tiu modesteco estas ironia.

² *Don Gonzalo... grand-kapitano*: Don Gonzalo Fernandez de Cordova, jam menciita kiel hispana guberniestro de Milanio, estis pra-ido de samnoma armeestro (1433-1515), konata antonomazie kiel «grand-kapitano».

gvidi militon ankaŭ en Italujo, eble estis la plej fervora instiganto al milit-deklaro; kaj dume, interpretante la intencojn, kaj anticipante la ordonojn de la menciita kortego, li jam faris kun la duko de Savojo traktaton por invadi kaj dividi Monferraton; kaj poste li facile elpetis ratifikon de la grafo duko, konvinkante lin, ke estos tre facile konkeri Casale-n, kiu estis la plej grava fortikaĵo el la porcio laŭpakte atribuota al la reĝo de Hispanujo. Tamen li deklaregis, ennome de la reĝo, ke li volas okupacii la landon nur kiel garantiaĵon, atende de l' verdikto de la imperiestro; ĉi-lastata intertempe, parte pro alies elpaŝoj, parte pro siaj apartaj motivoj, rifuzis doni investituron al la nova duko, al kiu li ordonegis lasi la disputatajn ŝtatojn sekvestre³ al li mem, kiu pli poste ilin aljuĝos laŭdeve, post aŭskulto de la disputantaj partioj. Al tiu ordonego ne volis cedi la Neversa senjoro.

Ankaŭ ĉi-lastata havis gravajn amikojn: kardinalon Richelieu, la veneciajn senjorojn, la papon, kiu estis, kiel ni jam diris, Urbano la 8-a. Sed la unua, tiam okupite pri l' sieĝo de Roĉelo⁴ kaj la milito kontraŭ Anglujo, kaj opoziciate de la partio de reĝino patrino Maria de' Medici, kontraŭa, pro siaj apartaj motivoj, al la Neversa domo, povis nur doni esperigajn vortojn. La venecianoj intencis nek elpaŝi, nek fari malkaŝajn deklarojn, antaŭ la eniro de l' franca armeo en Italujon; kaj kvankam ili kaŝe helpis laŭpove la dukon, tamen rilate la Madridan kortegon kaj la Milanian guberniestron, ili nenion faris krom protestoj, krom proponoj, krom admonoj, mildaj aŭ

³ *sekvestre*: depone atende verdikton, kiu solvos la disputon.

⁴ *Roĉelo*: franca urbo ĉe la Atlantika bordo, kiun Richelieu sieĝis, ĉar ĝi, aliĝinte al la protestanta hugenota partio, ribelis kontraŭ la franca registaro kaj alianciĝis kun Anglujo.

minacaj, laŭ-cirkonstance. La papo rekomendis la Neversanon al amikoj, propetis liafavore ĉe liaj kontraŭuloj, faris planojn por kompromiso; sed havigon de soldatoj li eĉ ne volis konsideri.

Tiele la du invadontaj aliancanoj povis des pli sekure komenci la interkonsentitan entreprenon. La duko de Savojo siaflanke invadis Monferraton; Don Gonzalo fervorege eksieĝis Casale-n; sed li ne trovis ĉe tio la tutan plezuron, kiun li estis imaginta: tiel ke vi ne kredu, ke ĉe milito nur prosperas rozoj. La hispana kortego ne helpis lin laŭ liaj deziroj, ĝi eĉ malhavigis la plej necesajn rimedojn; la aliancano helpis lin tro multe: mi aludas tion ke, konkerinte sian porcion, li ade pluketis partetojn de la destinita al la reĝo de Hispanujo. Don Gonzalo pro tio ronĝiĝis kiom ne direble; sed timante ke, se li iomete bruus, tiu Carlo Emanuele, tiel aktiva ĉe l' intrigoj kaj ŝanĝema ĉe l' traktatoj, kiel brava ĉe l' armiloj, sin turnus al Francujo, li devis fermeti la okulojn, glutaĉi, kaj silentadi. Aliflanke la sieĝo iris aĉe, longe, foje malantaŭen, ĉu pro la firma, vigla, rezoluta sinteno de la sieĝatoj, ĉu pro tio ke li havis malmulte da soldatoj, kaj ankaŭ, laŭ aserto de kelke da historiistoj, pro la multaj fuŝaĵoj, kiujn li mem faris. Pri ĉi tio ni lasas la veron kia ĝi estas, kaj, se efektive la afero status ĉi tiel, ni estas eĉ disponaj trovi ĝin bonega, se ĝi kaŭzis, ke malpli multe da homoj estis mortigitaj, stumpigitaj, kripligitaj, kaj, *ceteris paribus*⁵, almenaŭ malpli multe difektiĝis la tegmenteroj de Casale. En tia situacio li ricevis la sciigon pri la ribelo en Milano, kaj tien rapidis li mem.

Tie, inter la informoj, kiujn oni al li donis, oni menciis ankaŭ la ribelan kaj bruan forkuron de Renzo, kaj la verajn kaj

⁵ *ceteris paribus*: latine = eĉ se l' ceteraj kondiĉoj ne ŝanĝiĝus.

supozajn misfarojn kaŭzintajn lian areston; kaj oni povis al li diri ankaŭ, ke tia ulo estas rifuĝinta en la Bergama teritorio. Ĉi tiu cirkonstanco kaptis la atenton de Don Gonzalo. El tute alia fonto li estis informita, ke oni en Venecio pufiĝis pro la ribelo en Milano; ke komence oni tie kredis, ke li devos malsieĝi Casale-n, kaj ke ili plu pensis, ke li estas ankoraŭ konsternita kaj zorgoplena: des pli ke, tuj post tiu evento, alvenis la sciigo, dezirata de l' Veneciaj senjoroj kaj timegata de Don Gonzalo, pri l' kapitulaco de Roĉelo. Kaj ĉar tre brule ĉagrenis lin, kiel homon kaj kiel politikiston, ke tiuj senjoroj havas tian koncepton pri liaj aferoj, li gvatis ĉian oportunon por ilin persvadi, ke li tute nenion perdis el sia iama sekureco: ilin persvadi per induktoj; ĉar diri malkaŝe: mi ne timas, estus same kiel diri tute nenion. Konvena rimedo ĉi-cele estas montri sin ofendita, plendi, protesti: kaj tial, kiam vizitis lin la Venecia diplomato, por fari al li komplimenton, kaj samtempe por esplori, el liaj mieno kaj sinteno, kiel li statas interne (notu al vi ĉion; ĉar tio ĉi apartenas al antikva rafinita politiko), Don Gonzalo, menciinte la tumulton senzorge kaj kvazaŭ homo riparinta ĉion, faris la bruon, kiun vi scias, rilate la Renzo-aferon; same kiel vi scias la sekvaĵon de tio. Post tiam, li ne plu zorgis pri afero tiel bagatela kaj lia-koncerne finita; kaj kiam, longtempe pli poste, alvenis la respondo al la milit-kampo ĉe Casale, kien li estis reveninta, kaj kie li havis tute aliajn pensojn, li levis kaj balancis la kapon, kiel silk-raŭpo serĉanta folion: li restis momente senmova, por revivigi la memoron pri tiu okazaĵo, el kiu en li ne restis pli ol ombro; li rememoris la aferon, ekhavis rapidan, konfuzan ideon pri la persono; li transiris al alia zorgo, kaj ne plu pripensis ĉi tion.

Sed Renzo, kiu el la malmulto, kiun oni al li

subkomprenigis, nepre supozis tute alion ol tian indulgan senzorgecon, restis longe sen alia penso, aŭ pli ĝuste, sen alia klopodo, krom vivi kaŝite. Imagu, ĉu ne lin korŝiris la dezirego sendi siajn informojn al la virinoj, kaj ricevi la iliajn; sed kontraŭstaris du grandaj malhelpoj. Unue, ke ankaŭ li mem devus konfidi sin al sekretario, ĉar la povrulo scipovis nek skribi, nek legi, en la plena senco de la vorto; kaj se, demandite pri tio de doktoro Impliktrafulo, kiel eble vi memoras, li respondis jese, ĝi ne estis fanfaraĵo, aŭ blufpafo, kiel oni diras; sed veris, ke presitaĵojn li scias legi, kvankam li bezonis da tempo: sed manskribaĵo estas tute alia afero. Li devus do konfidi al tria homo siajn aferojn, kaj tiel ĵaluzan sekreton; kaj homo kapabla uzi skribilon, kaj samtempe fidinda, ne estis tiuepoke tiel facile trovebla; des pli en lando, kie oni havis neniun delongan konaton. La dua malfacilo estis trovi ankaŭ kurieron; homon ironan ĝuste en tiujn lokojn, kaj disponan surpreni komision pri la letero, kaj vere prizorgi ties liveron al la adresato; ankaŭ ĉiuj ĉi estis aferoj malfacile troveblaj en ununura homo.

Fine, post longa esplorado, li trovis homon, kiu skribos por li. Sed, ne sciante, ĉu la virinoj estas ankoraŭ en Monza, aŭ kie aliloke, li taksis oportune enmeti la leteron por Agnese en alian adresitan al patro Cristoforo. La skribisto surprenis ankaŭ la komision liverigi la korespondaĵon; li transdonis ĝin al homo pasonta ne malproksime de Pescarenico; ĉi tiu lasis ĝin, kun multe da rekomendoj, en ĉe-voja drinkejo en la plej proksima punkto; kaj ĉar la koverto estis adresita al monakejo, ĝi alvenis; sed kio okazis pli poste pri ĝi, neniam sciiĝis. Renzo, ne vidante respondon aperi, verkigis alian leteron, pli-malpli similan al la unua, kaj ĝin enmetis en alian, adresitan al

sia amiko, aŭ eble parenco, loĝanta en Lecco. Oni serĉis alian leter-portanton, oni trovis lin; ĉi-foje la letero atingis la adresaton. Agnese al-trotis al Maggianico, petis tiun kuzon Alessio ĝin legi kaj al ŝi klarigi: ŝi kunplanis kun li respondon, kiun li surpaperigis; oni eltrovis la rimedon, por sendi ĝin al Antonio Rivolta en ties loĝ-loko: ĉio ĉi tamen ne tiom rapide kiom ni ĝin rakontas. Renzo ricevis la repondon kaj reskribigis. Entute, estiĝis inter la duopo korespondado nek rapida nek regula, kaj tamen kontinua, malgraŭ saltoj kaj intervaloj.

Sed por havi ideon pri tiu korespondado, necesas koni, kiel tiaj aferoj tiam iris, aŭ pli bone, kiel ili iras; ĉar, koncerne tiun ĉi detalon, mi kredas, ke malmulto aŭ tute nenio ŝanĝiĝis.

La kamparano nekapabla skribi, kaj tamen bezonanta skribi, sin turnas al homo, kiu tiun arton konas, lin elektante laŭpove el siaj samranguloj, ĉar koncerne aliajn li hezitas aŭ nemulte fidas; li informas lin, pli-malpli orde kaj klare, pri l' antecedentoj:⁶ kaj sammaniere al li esprimas la objekton por surpaperigi. La literatoro parte komprenas kaj parte miskomprenas, donas konsilojn, proponas ŝanĝojn, diras: lasu al mi la aferon; li kaptas la plumon, literaturigas laŭpove la pensojn de la alia, ilin korektas, plibonigas, emfazas, aŭ mildigas, li eĉ preterlasas, laŭ ke al li ŝajnas, ke tio pli konvenas al la afero: ĉar estas neeviteble: tiu, kiu scias pli multe ol aliaj, ne volas esti nur materia instrumento en iliaj manoj; kaj kiam li enmiksiĝas en alies aferojn, li iom volas ankaŭ ilin direkti laŭ sia vid-punkto. Krom ĉio tio, la menciita literatoro ne ĉiam sukcesas diri ĉion kion li volus; foje okazas, ke li diras tute alion; tiaĵo okazas eĉ al ni, kiuj skribas por

⁶ *antecedentoj*: antaŭaj eventoj.

presigi. Kiam la letero tiel komponita atingas la manojn de korespondanto same ne intima kun la alfabeto, li portas ĝin al alia tiunivela klerulo, kiu ĝin al li laŭtlegas kaj klarigas. Estiĝas problemoj pri ties interpreto, ĉar la koncernato, surbaze de sia kono de la antecedentoj, pretendas ke certaj vortoj signifas ion; dum la leganto, surbaze de sia intimeco kun la skribaĵo, pretendas ke ili signifas alion. Fine necesas ke la nescianto sin konfidu en la manojn de la scianto, kaj komisiu ĉi-lastan pri respond-letero, kiu, verkite laŭ la suko de la propona letero, ricevos pli poste similan interpreton. Kaj se, aldone al tio, la korespondanta homo estas iom ĵaluza; se tio koncernas sekretajn aferojn, kiujn oni ne volas komprenigi al tria homo kaze ke la letero perdiĝus; se, konsidere tion, ĉeestis la pozitiva intenco diri la aferojn ne tute klaraj; tiam, se la korespondado iomete daŭras, fine la du partioj interkompreniĝos samkiel aliepoke du skolastikanoj disputantaj pri entelekio⁷ dum kvar horoj: por ne citi aktualajn ekzemplojn, kaj eviti ke nin trafu manfrapo.

Nu, la kazo de niaj du korespondantoj estis ĝuste tia. La unua letero skribita ennome de Renzo enhavis multe da temoj. Komence, krom la rakonto pri la forkuro, multe pli konciza sed ankaŭ pli konfuza ol tiu, kiun vi legis, ĝi enhavis raporton pri lia nuna situacio. El ĝi, nek Agnese, nek la dragomano⁸ sukcesis ĉerpi klaran kaj kompletan signifajon: sekreta averto, ŝanĝo de nomo, esti sekura, sed devi resti kaŝita... aferoj en si

⁷*skolastikanoj... entelekio*: skolastiko estis mezepoka aristotelana filozofio, inklina al subtilegaj rezonmanieroj; *entelekio* estas skolastika termino.

⁸ *dragomano*: orientlanda ambasadora interpretisto (ĉi tie la termino estas ironia).

mem ne tro intimaj al iliaj intelektoj, kaj en la letero diritaj iom ĉifre. Poste enestis angoraj, pasiaj demandoj pri l' okazaĵoj de Lucia, kun malklaraj kaj doloraj aludoj pri onidiroj atingintaj ĝis Renzo. Enestis fine malcertaj kaj foraj esperoj, planoj por la estonto, kaj intertempe promesoj kaj petegoj plenumi la faritan promeson, perdi nek paciencon nek kuraĝon, atendi pli bonajn cirkonstancojn.

Post iom da tempo Agnese trovis fidindan rimedon por irigi ĝis la manoj de Renzo respondon, kun la kvindek eskudoj al li destinitaj de Lucia. Vidante tiom da oro, Renzo tute ne sciis, kion pripensi; kaj kun la animo ekscitita de miro kaj suspenso, kiuj ne lasis lokon al kontento, li rapidis serĉi la sekretarion, por interpretigi la leteron, kaj ricevi la ŝlosilon de tia stranga mistero.

En tiu letero la sekretario de Agnese, post iom da plendo pri la mis-klareco de lia letero, priskribis, kun preskaŭ egala klareco, teruran okazaĵon, kiu trafis tiun personon (tiele li diris); kaj ĉi tie li donis klarigon pri la kvindek eskudoj; poste pritraktis la voton, sed per frazturnoj, aldonante, per vortoj pli rektaj kaj klaraj, la konsilon pacigi la koron kaj ne plu pensi pri ŝi.

Renzo preskaŭ indignis kun la leganto-interpretanto: li tremis, hororis, furiozis pro la aferoj, kiujn li komprenis, kaj pro tiuj, kiujn li ne sukcesis kompreni. Tri aŭ kvar fojojn li legis la teruran skribaĵon, jen pensante ke li komprenas ĝin pli bone, jen kun la impresio, ke obskuriĝis tio, kio ĵus al li ŝajnis klara. Kaj, sub tiu febro de pasioj, li postulis, ke la sekretario tuj kaptu la plumon kaj respondu. Post kiel imageble plej akraj esprimoj de kompatato kaj teruro pro l' okazintaĵoj de Lucia, «skribu», li daŭrigis diktante, «ke mi la

koron pacigi ne volas, kaj neniam pacigos; ke ne estas konsiloj por doni al knabo kia mi; ke la monon mi ne tuŝos; ke mi tenas ĝin depone, por la doto de la junulino; ke la junulino tute devas esti mia; ke mi tute nenion scias pri promeso; ke mi ĉiam aŭdis, ke la Madono propetas por helpi afliktitojn, kaj havigi Di-favorojn, sed por spiti kaj rompi donitan vorton, neniam mi aŭdis; kaj ke tiaĵo tute ne povas havi konsiston; kaj ke per tiu ĉi mono ni starigos hejmon ĉi tie; ke, se nun mi estas iom implikita, temas pri ŝtormo, kiu baldaŭ forpasos»; kaj aliajn similajn aferojn.

Siatempe Agnese ricevis tiun leteron, kaj re-skribigis; kaj la korespondado plu-daŭris, en la maniero, kiun ni diris.

Lucia, kiam la patrino sukcesis, mi ne scias per kia rimedo, sciigi al ŝi, ke tiu ulo estas vivanta kaj sendifekta kaj avizita, eksentis grandan konsolon, kaj nenion ŝi deziris, krom ke li forgesu ŝin; aŭ, por diri la aferon tute precize, ke li strebu forgesi ŝin. Siaflanke, ŝi ĉiutage sin devigis fari la samon rilate lin; kaj ŝi aplikis ĉian rimedon, por tion efektivigi. Ŝi persistis ĉe sia laboro, ŝi klopodis tute absorbiĝi en ĝi: kiam la bildo de Renzo prezentiĝis al ŝi, ŝi mense recitis aŭ kantis preĝojn. Tiu bildo plejofte ne venis malkaŝe; sed kvazaŭ malice ĝi enŝteliĝis malantaŭ aliaj bildoj, tiel ke ŝia menso konsciĝis pri ĝi nur post ties kelktempa ĉeesto. La penso de Lucia ofte kunestis kun la patrino: kaj kiel ĝi ne kunestus? Kaj la imaga Renzo alvenis tute kviete kiel tria, samkiel iam faris plurfoje la reala Renzo. Tiele li enmiksiĝis kun ĉiaj personoj, en ĉiaj lokoj, en ĉiaj memoroj pri la pasinteco. Kaj se la povrulino foje sin allasis al revo pri sia estonto, ankaŭ tie li aperis, almenaŭ por diri: ĉiuokaze mi ne ĉeestos. Se tute forigi la penson pri Renzo estis klopodo senespera, ŝi tamen sukcesis

igi ĝin malpli ofta kaj malpli forta, ol kiom ŝia koro volus: ŝi sukcesus eĉ pli multe, se ŝi sola tion volus. Sed alestis Damo Prassede, kiu sin deviginte tute forigi tiun viron el ŝia koro, ne eltrovis pli bonan rimedon ĉi-cele, ol ofte paroli pri li. «Nu bone?» ŝi diris: «ĉu oni ne plu pensu pri li?».

«Mi neniun pripensas», respondis Lucia.

Damo Prassede ne kontentiĝis per tia respondo; ŝi replikis, ke endas faktoj kaj ne vortoj; kaj ŝi longe parolis pri l' moroj de l' fraŭlinoj, kiuj, ŝi diris, «kiam ili havas enkore friponon (kaj tiudirekte ili ĉiam inklinas), ili ne plu dekroĉas lin. Se pro ajna akcidento fiaskas honesta kaj konvena partio koncerne bonmoron kaj bone aranĝitan viron, ili tuj rezignacias; sed, se temas pri sen-bridulo, ĝi estas senrimeda plago». Kaj tiam ŝi komencis panegiri pri l' povra forestanto, pri l' fripono veninta al Milano por ŝteli kaj murdi; kaj ŝi strebis devigi Lucia-n konfesi la friponaĵojn, kiujn tia ulo certe faris ankaŭ en sia vilaĝo.

Lucia, kun voĉo trema el honto, el ĉagreno, el la indigno, kia ĝi povis troviĝi en ŝia milda animo kaj modesta rango, certigis kaj atestis, ke tiu povrulo en sia vilaĝo okazigis neniam onidirojn, krom bonajn; kaj ŝi dezirus, ŝi diris, ke ĉeestu kelke el la vilaĝanoj, por tion atesti. Ankaŭ koncerne la aventurojn en Milano, pri kiuj ŝi estis ne tute informita, ŝi pledis por li, ĝuste surbaze de sia kono pri li kaj lia konduto ek de lia infanaĝo. Ŝi pledis, aŭ intencis pledi por li, nur pro devo de karitato, pro amo al vero, kaj, por diri precize la vorton, per kiu ŝi klarigis al si mem sian senton, ŝi defendis lin kiel proksimulon. Sed el tiuj ĉi pledoj Damo Prassede eliris novajn argumentojn por konvinki Lucia-n, ke ŝia koro ankoraŭ tute ardas por li. Kaj verdire mi ne tute scias, kiel vere statis la

afero en tiuj momentoj. La malinda bildo, kiun la oldulino kunmetis pri l' povrulo, revokis kiel reagon en la menso de la junulino pli viva kaj klara ol iam ajn la ideon, kiu tie pri li formiĝis dum tiel longa familiareco; la memoroj, perforte kunpremitaj, amase malvolviĝis; la malinklino kaj malŝato revokis multe da iamaj motivoj por estimo; la blinda kaj perforta malamo estigis pli fortan kompaton: kaj kune kun tiaj afekcioj, neniu scias kiom povis ĉeesti aŭ malesti el tiu alia sento, kiu malantaŭ ili tiel facile sin enŝovas en la animojn; ni imagu kiom multe en animon, de kiu oni klopodas ĝin elpeli perforte. Kiel ajn estis la afero, la parolo flanke de Lucia neniam longe daŭris; ĉar la vortoj baldaŭ finiĝis per ploro.

Se al tia trakto-maniero Damon Prasede instigus longa malamo kontraŭ Lucia, eble tiuj larmoj ŝin tuŝus kaj haltigus; sed, ĉar ŝi parolis bonintence, ŝi daŭrigis senŝancele: kiel la ĝemoj kaj petegaj krioj povus reteni armilon de malamiko, sed ne operacilon de kirurgo. Sed, taŭge farinte sian devon tiufoje, ŝi transiris el pikoj kaj riproĉoj al admonoj kaj konsiloj, kondimentitaj eĉ per kelke da laŭdoj, por tiel mildigi akron per dolĉo, kaj pli bone efiki, influante la animon ĉiuflanke. Certe, el tiaj bataletoj (kiuj ĉiam havis preskaŭ egalajn komencon, mezon kaj finon), ne restis al la bonvirta Lucia vera rankoro kontraŭ la akra predikantino, kiu cetere ŝin traktis kun granda dolĉeco; kaj ankaŭ en tio vidiĝis ties bona intenco. Restis tamen en Lucia bolado kaj ekscitiĝo de pensoj kaj sentoj, tiel ke ŝi bezonis multe da tempo kaj klopodo por reveni al sia antaŭa ajna kvieto.

Bonŝance Lucia ne estis la sola, al kiu Damo Prasede devis bonfari; tiel ke la bataletoj ne povis esti tiel oftaj. Krom la cetera servantaro: ĉiuj cerboj pli-malpli bezonantaj rektigon

kaj gvidon; krom ĉiuj ceteraj oportunoj plenumi la saman taskon, pro nura bonkoreco, favore al multaj, rilate kiujn ŝi havis nenian devon: oportunojn ŝi serĉis, se ili ne prezentiĝis per si mem; ŝi havis ankaŭ kvin filinojn; el kiuj neniu vivis en ŝia hejmo, sed kiuj kaŭzis pli da zorgo, ol se ili ĉeestus. Tri el ili estis monakinoj, kaj du edzinoj; kaj mem-kompreneble Damo Prassede havis por vigli super tri monakinejoj kaj du familioj: vasta kaj komplika klopodaĵo, kaj des pli peniga, ĉar du edzoj, subtenate de respektivaj patroj, patrinoj, gefratoj; ĉar tri abatinoj, apogate de aliaj instancoj kaj de multnombraj monakinoj, ne volis akcepti ŝian superkontrolon. Temis pri milito, eĉ kvin militoj, kaŝaj, iagrade afablaj, sed vivaj kaj sen batal-haltoj: ĉie regis daŭra klopodo eviti ŝian zorgemon, bari aliron de ŝiaj konsiloj, eskapi de ŝiaj postuloj, teni ŝin laŭeble malscia pri ĉiu afero. Mi pretersilentas la konfliktojn, la malfacilaĵojn, kiujn ŝi renkontis ĉe manovrado de aliaj eĉ pli fremdaj aferoj: estas ja konate, ke plejofte al homoj oni devas bonfari perforte. La loko, kie ŝi povis libere apliki sian zorgemon, estis ŝia hejmo: tie ĉiu persono estis tute kaj pri ĉio sub ŝia aŭtoritato, escepte de Don Ferrante, kun kiu la aferoj iris en tute speciala maniero.

Kiel klerulo, li ŝatis nek komandi nek obei. Ke senjorino edzino estu reganto en ĉiuj hejm-aferoj, li konsentis. Sed ke estu li mem servanto, tute ne. Kaj se, petite, li ĉe-bezone al ŝi disponigis sian plum-oficon, tion li faris nur pro sia aparta genieco ĉi-rilate; cetere, eĉ ĉi-koncerne li kapablis nei, kiam li ne estis konvinkita pri tio, kion ŝi volus ke li skribu. «Via moŝto mem klopodu», li diris en tiaj okazoj; «vi faru per vi mem, ĉar la afero al vi ŝajnas tiom klara». Damo Prassede, provinte kelktempe, sed vane, lin tiri el lasi-fari al fari,

reduktiĝis al grumblado kontraŭ li, nomante lin neni-faranto, fiks-ideano, literatoro; titolo en kiu kunestis, krom indigno, ankaŭ iom da plezuriĝo.

Longajn horojn Don Ferrante pasigis en sia studĉambro, kie li havis rimarkindan libro-kolekton, el preskaŭ tricent volumoj: ĉiuj verkoj elektitaj el la plej renomaj⁹ pri pluraj fakoj; kaj pri ĉiuj-ĉi fakoj li estis pli-malpli sperta. Pri astrologio, prave li estis taksata pli ol diletanto; ĉar li posedis pri ĝi ne nur tiujn ĝeneralajn nociojn, kaj tiun komunan terminaron, pri influoj, aspektoj kaj konjunkcioj; sed li kapablis konvene paroli, kvazaŭ el katedro, pri la dek du zodiakaj domoj, pri la maksimumaj cirkloj, pri la lumaj kaj la tenebraj gradoj, pri astraj maksimumaj leviĝoj kaj malleviĝoj, pri transiroj kaj rivoluoj, entute pri la plej certaj kaj plej kaŝaj principoj de tiu scienco. Kaj ek de eble dudek jaroj li, en oftaj kaj longaj disputoj, pledis por la dis-domigo¹⁰ de la ĉiela volbo laŭ Cardano, kontraŭ alia klerulo, akrega partiano de Alcabizio, pro nura obstino, diris Don Ferrante; kiu, kvankam volonte agnoskante la superecon de la antikvuloj, tamen ne toleris tian principan malpravigon de la modernuloj¹¹, eĉ kiam ties pravo estis tiel klara, ke ĉia homo povus ĝin konstati. Li

⁹ *verkoj el la plej renomaj*: Manzoni, kiu apartenas al la epoko de klerismo kaj racionalismo, ironie kritikis tiun ĉi tipan klerulon de la 17-a jarcento, kiu konsideris seriozaj studobjektojn ne-sciencajn (kiel magion kaj astrologion), aŭ frivolajn (kiel kavalirismon), kaj kiu nur papage ripetis eĉ racian studobjekton, kia estas la filozofio.

¹⁰ *disdomigo... volbo*: la divido de la ĉiela volbo laŭ domoj, t.e. zodiakaj signoj, estis diversa laŭ la diversaj astrologiaj skoloj.

¹¹ *modernuloj*: Don Ferrante partianis por la “moderna” (ne-sciencia!) astrologo Cardano, kaj ignoris la sciencajn malkovrojn de tiutempaj astronomoj, kiel Galileo kaj Kepler.

konis, pli ol modeste, ankaŭ la historion de tiu scienco; li scipovis ĉe-bezone citi la plej famajn efektiviĝintajn prognozojn, kaj rezoni subtile kaj erudicie pri aliaj famaj prognozoj fiaskintaj, por pruvi ke kulpis ne la scienco, sed tiuj kiuj ne ĝuste aplikis ĝin.

Pri la antikva filozofio li lernis kiom sufiĉe, kaj li daŭre pliigis ties lernadon, legante Diogenon Laertion¹². Sed ĉar ne eblas aliĝi al ĉiuj sistemoj, kiel ajn belaj; kaj ĉar, por esti filozofo, oni devas elekti unu aŭtoron, tial Don Ferrante elektis Aristotelon, kiu, kiel li diris, estas nek antikva nek moderna; li estas la filozofo. Li havis ankaŭ plurajn verkojn de liaj plej saĝaj kaj subtilaj anoj inter la modernuloj: la verkojn de liaj kontraŭuloj li neniam volis legi, por ne malŝpari tempon, li diris; nek aĉeti, por ne malŝpari monon. Li tamen escepte spacon havigis en sia biblioteko por tiuj famaj dudek du libroj, *De subtilitate*, kaj por kelke da aliaj anti-aristotelismaj verkoj de Cardano, dank' al lia valoro koncerne astrologion; deklarante ke la homo, kiu povis verki la traktaton *De restitutione temporum et motuum cælestium*, kaj la libron *Duodecim geniturarum*¹³, meritas aŭskulton, eĉ kiam li diras fuŝaĵojn; kaj ke la plej grava difekto de tiu viro estis havi tro multe da talento; kaj ke neniu povus imagi, kien do li atingus eĉ rilate filozofion, se li restus sur la rekta vojo. Cetere Don Ferrante, malgraŭ tio, ke la kleruloj lin taksis plej sperta aristotelisto, tamen taksis sin ne sufiĉe faka; kaj pli ol unufoje li tute modeste deklaris, ke: esenco, universalajaĵoj, animo de la

¹² *Diogeno Laertio*: helena historiisto de la filozofio; erudicia, sed ne profunda.

¹³ *De subtilitate... De restitutione temporum et motuum cælestium... Duodecim geniturarum*: titoloj de latinlingvaj verkoj de Cardano.

mondo, naturo de la aĵoj, estas konceptoj ne tiom klaraj, kiom kredeble.

Koncerne la naturan filozofion, li faris ĝin amatoraĵo pli ol studobjekto; eĉ la verkojn de Aristotelo ĉi-koncerne, kaj tiujn de Plinio, li estis leginta pli ol studinta: tamen, per tia legado, per la sciigoj ĉe-okaze kolektitaj el la traktatoj pri ĝenerala filozofio, per kelke da flug-legoj el la *Natura Magia* de Porta, el la tri historioj *lapidum, animalium, plantarum*¹⁴ de Cardano, el la Traktato pri herboj, plantoj, animaloj de Alberto la Granda, kaj kelke el malpli gravaj verkoj, li scipovis siatempe regi konversacion, traktante pri la plej mirindaj ecoj kaj la plej specialaj kuriozaĵoj de multe da kurac-herboj; ekzakte priskribante la formojn kaj kutimojn de l' sirenoj kaj de l' unika fenikso¹⁵; klarigante kiel la salamandro kuŝas en fajro ne brulante; kiel la fiŝeto nome remoro havas forton kaj lerton abrupte haltigi, en alta maro, ajnan grandan ŝipon; kiel gutetoj el roso fariĝas perloj en la sino de l' konkoj; kiel la ĥameleono sin nutras per aero; kiel el glacio iom post iom kompaktiĝinta, ĉe l' paso de l' jarcentoj formiĝas kristalo; kaj aliaj el plej mirindaj sekretoj de l' naturo.

Koncerne magion kaj sorĉ-arton, li studis pli profunde, ĉar temas, diras nia anonimulo, pri scienco multe pli aktuala kaj necesa, kaj en kiu la faktoj estas ege pli gravaj, kaj pli proksimaj por kontroli. Superfluas diri, ke ĉe tia studado, li neniam alion celis, krom kleriĝi kaj koni ĝisfunde la tute fiajn artojn de l' fi-sorĉistoj, por sin gardi kaj protekti kontraŭ ili. Kaj gvidate ĉefe de la granda Martino Delrio (la scienculo), li

¹⁴ *lapidum, animalium, plantarum*: latine = pri ŝtonoj, animaloj, plantoj.

¹⁵ *sirenoj... fenikso*: mitologiaj estuloj. La tuta kunteksto ironie aludas la pseŭdosciencajn konceptojn de Don Ferrante kaj lia epoko.

kapablis trakti *ex professo*¹⁶ pri enamiga sorĉaĵo, dormiga sorĉaĵo, envulta¹⁷ sorĉaĵo, kaj la senfinaj specoj, kiujn bedaŭrinde, aldonas la anonimulo, oni vidas aktualaj ĉiutage, el la tri ĉefklasoj de magiaĵoj, kun tiel tragikaj efikoj. Same vastaj kaj fonditaj estis la scioj de Don Ferrante rilate historion, ĉefe universalan: pri kiu liaj aŭtoroj estis Tarcagnota, Dolce, Bugatti, Campana, Guazzo: entute la plej renomaj¹⁸.

Sed kio estas historio, diris ofte Don Ferrante, sen politiko? Ĝi estas gvidanto, kiu marŝadas, marŝadas, sekvate de nenia voj-lernanto, kaj konsekvence tia gvidanto fuŝas siajn paŝojn; samkiel politiko sen historio estas sengvida marŝanto. Estis do en liaj ŝrankoj breto dediĉita al la politikistoj; kie, inter multaj maldikaj kaj modest-famaj, elstaris la verkoj de Bodino, Cavalcanti, Sansovino, Paruta, Boccacini. Du estis tamen la libroj, kiujn Don Ferrante tute preferis ĉi-fake; du, kiujn portempe li kutimis difini unuaj, neniam povante decidi, al kiu aljuĝi unike tiun gradon: unu, la *Princo* kaj la *Diskursoj* de la fama Florenca sekretario¹⁹; ja fripono, diris Don Ferrante, sed profunda; la dua, la *Ŝtata racio* de la ne malpli fama Giovanni Botero; ja honesta, li diris ankaŭ, sed subtila. Sed, nemulte antaŭ la tempo, kiu limigas nian historion, aperis la libro, kiu finis la problemon pri unuarangeco, preterpasante

¹⁶ *ex professo*: latine = kompetente.

¹⁷ *envulta*: malbonfara (difektiga aŭ pereiga).

¹⁸ *plej renomaj*: ironie; ĉi tie kaj pli sube temas pri aŭtoroj kaj verkoj nuntempe tute forgesitaj.

¹⁹ *Florenca sekretario*: Makiavelo el Florenco (1469-1527), politikisto, kiu teoriumis senmoralan politikon, kiu tial nomiĝis makiavelismo.

eĉ la verkojn de tiuj du *matadoroj*²⁰, diris Don Ferrante; la libro en kiu estas enfermitaj kaj kvazaŭ distilitaj ĉiaj malicoj por koni, kaj ĉiaj virtoj por praktiki; tiu libro maldika, sed tute ora; unuvorte, la *Reganta Ŝtatisto*²¹ de Don Valeriano Castiglione: de tiu famega viro, pri kiu oni povas diri, ke la plej grandaj kleruloj lin konkure laŭdegis, kaj la plej grandaj eminentuloj lin konkure akaparis; de tiu viro, kiun papo Urbano la 8-a honoris, kiel konate, per grandiozaj laŭdegoj; kiun kardinalo Borghese kaj la Napola Vicreĝo, Don Pietro de Toledo, instigis priskribi, ambaŭ sensukcese, la unua la historiaĵojn de papo Paŭlo la 5-a, la alia la militojn de la Katolika²² Reĝo en Italujo; de tiu viro, kiun Ludoviko la 13-a, reĝo de Francujo, nomumis sia historiisto laŭ sugesto de kardinalo Richelieu; al kiu duko Carlo Emanuele de Savojo donis la saman taskon; por kies laŭdo, se neglekti aliajn glorajn atestojn, dukino Cristina, filino de la Kristanega²³ Reĝo Henriko la 4-a, povis en diplomo, inter multe da aliaj titoloj, mencii la «certecon pri la famo, kiun li ricevas en Italujo, kiel unuaranga verkisto en nia epoko».

Sed se, en ĉiuj menciitaj sciencoj, Don Ferrante povis diri sin klera, estis unu, en kiu li meritis kaj ĝuis la titolon de profesoro: la kavalirisma scienco. Li ne nur pritraktis ĝin vere majstre, sed ofte petite interveni en honor-aferoj, ĉiufoje li donis verdikton. Li havis en sia biblioteko, kaj oni povas diri

²⁰ *matadoroj* = (taŭro)buĉistoj: hispanismo, kun la senco de “ĉampionoj”.

²¹ *Reganta Ŝtatisto*: verko pri politiko tiam laŭmoda, sed fakte senvalora.

²² *Katolika*: honor-epiteto de la hispanaj reĝoj.

²³ *Kristanega*: honor-epiteto de la francaj reĝoj.

en sia kapo, la verkojn de l' plej renomaj aŭtoroj ĉi-fake: Paride dal Pozzo, Fausto da Longiano, Urrea, Muzio, Romei, Albergato, Forno unua kaj Forno dua de Torquato Tasso, kies li regis, kaj laŭbezone kapablis citi parkere, ĉiujn fragmentojn tiel de la Liberigita kiel de la Konkerita Jerusalemo²⁴, kiuj rajtas roli kiel sendiskutaj tekstoj koncerne kavalirismen. Sed la aŭtoro de la aŭtoroj, laŭ lia koncepto, estis nia fama Francesco Birago, kun kiu li eĉ renkontiĝis pli ol unufoje, por verdikti super honor-kazoj; kaj kiu siaflanke parolis pri Don Ferrante kun specialaj estim-esprimoj. Kaj ek de la apero de la *Kavalirismaj Diskursoj* de tiu eminenta verkisto, Don Ferrante senhezite prognozis, ke tiu ĉi verko ruinigos la aŭtoritaton de Olevano, kaj restos, kune kun l' aliaj noblaj frataj verkoj, kiel kodo el unuaranga prestiĝo ĉe l' posteuloj: profetaĵo, diras la anonimulo, pri kiu ĉia homo povas konstati, kiel ĝi efektiviĝis.

Post la kavalirismo, nia anonimulo traktas pri la beletraj verkoj; sed ni komencas dubi, ĉu vere la leganto tre emas plu sekvi lin en tiu ĉi revuado; kaj eĉ timi, ke ni jam gajnis la titolon de servema kopiisto aparte por ni mem, kaj de enuiganto kune kun la supre laŭdita anonimulo, pro tio ke ni naiv-kompleze lin sekvis ĝis ĉi tie koncerne aferon fremdan al la ĉef-rakonto, kaj kiun verŝajne li traktis tiel malkoncize, nur por elmontri klerecon, kaj pruvi ke li ne estas eksmoda en sia jarcento. Ni tamen, lasante la skribiton skribita, por ne vanigi nian penon, preterlasos la ceteron, por reveni survojen: des pli ke ni havas ankoraŭ longan vojpecon por trairi, sen renkonti niajn rolulojn, kaj alian eĉ pli longan, antaŭ ol ni trovos tiujn,

²⁴ *Forno unua... dua... Liberigita Jerusalemo... Konkerita Jerusalemo:* temas pri kvar verkoj (du dialogoj kaj du kavalirismaj poemegoj) de la grava itala poeto Torquato Tasso (1544-1595).

kies okazaĵoj al la leganto certe plimulte interesas, se io ajn al li interesas en ĉi-ĉio.

Ĝis la aŭtuno de la posta jaro 1629-a, ĉiuj restis, vole aŭ devige, proksimume en la situacio, en kiu ni lasis ilin, kaj nenio menciinda al ili aŭ okazis, aŭ oni faris. Venis la aŭtuno, kiam Agnese kaj Lucia esperis renkontiĝi: sed grava publika evento tiun intencon vanigis: kaj ĉi tio estis certe unu el ties malplej gravaj konsekvencoj. Sekvis aliaj gravaj eventoj, kiuj tamen portis neniun rimarkindan ŝanĝon al la sorto de niaj roluloj. Fine novaj okazaĵoj, pli ĝeneralaj, pli fortaj, pli ekstremaj, atingis eĉ ilin, eĉ la plej et-nivelajn laŭ la monda valor-skalo: kiel vasta, pelanta, vaganta ciklono, ŝirante kaj elradikigante arbojn, levante tegmenterojn, malkovrante kampanilojn, faligante muregojn kaj disbatante ties rubojn, levas ankaŭ la pajlerojn kaŝitajn interherbe, kaj en anguletoj elserĉas velkajn kaj malpezajn foliojn, kiujn malpli forta vento tien estis forpelinta, kaj ilin kuntrenas kaj disportas en sia rabado.

Nu, por klarigi la rakontotajn privatajn aferojn, ni tute devas iele tiele antaŭmeti raporton pri la publikaj, deirante iom malproksime.

XXVIII

Post tiu ribelo de l' tago de sankta Marteno kaj ties morgaŭo, ŝajnis ke abundeco revenis en Milanon, kvazaŭ mirakle. Da pano abunde ĉe ĉiuj bakistoj; ties prezo, kiom en plej prosperaj jaroj; kaj da faruno proporcie. La homoj, kiuj dum tiuj du tagoj penis kriegi kaj fari eĉ plie, nun rajtis (escepte la malmultajn kaptitojn) plezuriĝi pri tio: kaj ne kredu ke ili tion evitis, tuj kiam ĉesis la tuja teruro pri arestoj. Sur placoj, ĉe strat-anguloj, en tavernoj, estis malkaŝa ĝojego, interdenta gratulado kaj fanfaronado, ke oni ja trovis rimedon, por malkarigi la panon. Sed meze de l' festado kaj fierado, estis (kaj kiel povus manki?) ia malkvieto, antaŭsento ke la afero ne longe daŭros. Oni urĝis bakistojn kaj farunistojn, kiel jam alifoje, okaze de tiu artifika kaj momenta abundo estigita per la fiksprezo de Antonio Ferrer; ĉiuj konsumis malŝpare; kiu havis iom da rezervita mono, tiu investis ĝin je pano kaj faruno; ili igis rezervujoj kestojn, bareletojn, kaldronegojn. Tiele, konkure ĝuante la aktualan malkarecon, ili malebligis, mi ne diras ties daŭrigadon, jam per si mem neeban, sed eĉ momentan pludaŭron. Kaj jen, la 15-an de novembro, Antonio Ferrer, *De orden de Su Excelencia*¹, publikigis kriaĵon, per kiu li tute malpermesis, al ĉiu ajn havanto hejme grenon aŭ farunon, plu aĉeti da ĝi, kaj al ĉiuj homoj aĉeti panon pli ol bezonate por du tagoj, *kontrau monaj kaj korpaj punoj, arbitre de Lia Ekscelenco*; kun ordonego al ĉiuj devigataj pro ofico, kaj al ĉiu ajn persono, denunci la malobservantojn; kun ordono al la juĝistoj enketi en la hejmoj al ili eventuale indikitaj; kaj samtempe ordonon al la bakistoj teni la butikojn

¹ *de orden de Su Excelencia*: hispane = laŭ ordono de Lia Ekscelenco, t.e. la Guberniestro.

tute provizitaj per pano, *kontrau puno, kaze de malobeo, de kvin galeraj jaroj, kaj plimulte laŭ arbitro de L.E.* Se iu kapablas imagi tian kriaĵon plenumita, tiu nepre havas mirindan imago-povon; kaj certe, se ĉiuj tiuepoke publikigitaj kriaĵoj estus obeitaj, la Milana duklando tiam nepre havas almenaŭ tiom da viroj surmare, kiom da ili povas havi Granda Britujo² nunepoke.

Kiel ajn statis la afero, kune kun la ordono fari multe da pano, necesis ankaŭ ne malhavigi al la bakistoj materialon por ĝin fari. Oni jam elpensis (kiel ĉiufoje en tempo de malsato renaskiĝas klopodo panigi produktojn ordinare konsumatajn aliforme), oni elpensis enmeti rizon kiel ingrediencan de mikspano, kiel oni ĝin nomis. La 23-an de novembro jen kriaĵo, kiu konfiskas, laŭ ordono de la proviantestro kaj de la dekdu-persona proviant-komitato, duonon de la vestita, tio estas brano-hava³ rizo (*rizego*, oni nomis ĝin, kaj oni nomas ankoraŭ nuntempe ĉi tie), kiun oni eventuale posedas; kaj ĉiu ajn, kiu tenas ĝin sen permeso de tiuj sinjoroj, perdos la tutan varo-kvanton, kaj devos pun-pagi tri eskudojn por ĉiu buŝelo. Puno tute modera, kiel ĉiu per si mem komprenas.

Sed tiun ĉi rizon oni ja devis pagi, kaj je prezo tro misproporcia kun tiu de la pano. La taskon kovri la grandegan diferencon oni ŝuldigis al la urbo; sed la Konsilio de l' dekestroj, kiu tiun taskon surpronis por la urbo, rezoluciis, la saman tagon 23-an de novembro, atentigi la guberniestron, ke ne eblas tion elteni pli longe. Kaj la guberniestro, per kriaĵo de

² *Granda Britujo*: pluraj kriaĵoj minacis, kiel punlaboron, remadon sur galeroj (= ŝipoj): epoke de Manzoni, Granda Britujo estis koloniisma potenco kun granda floto.

³ Brano estas gren-ŝelo.

la 7-a de decembro, fiksita la prezo de la menciita rizo je liroj dek du por ĉiu buŝelo: kontraŭ eventualaj postulantoj pli multe, aŭ rifuzantoj ĝin vendi, li trudis la perdon de la tuta varo-kvanto kaj samvaloran mon-punon, *kaj pli grandan punon monan kaj ech korpan ghis galero, laŭ arbitro de L.E., laŭ kvalito de kazoj kaj personoj.*

Por la sen-brana rizo la prezo jam estis fiksita antaŭ la ribelo; kiel verŝajne la fiks-prezo aŭ maksimumo (se uzi dirmanieron famegan en la modernaj analoj⁴) de la tritiko kaj de l' ceteraj pli ordinaraj grenajoj, supozeble estis difinita per aliaj kriaĵoj, kiujn tamen ni ne sukcesis vidi.

Ĉar tio gardis la panon malkara en Milano, konsekvencis ke el la kamparo procesiis⁵ al la urbo popolo, por aĉeti da ĝi. Don Gonzalo, por ripari ĉi tiun malkonvenaĵon, laŭ lia esprimmaniero, malpermesis, per alia kriaĵo de la 15-a de decembro, forporti el la urbo da pano pli multe ol laŭ la valoro de dudek groŝoj; li minacis kiel punon la perdon de la pano mem, kaj dudek kvin eskudojn, *kaj en kazo de nepoveco, du ŝnur-tirojn publike, kaj ech pli grandan punon* laŭkutime, *laŭ arbitro de L.E.* La 22-an de la sama monato (kaj oni ne komprenas la kialon de tia malfruo), li publikigis similan ordonon koncerne farunojn kaj grenojn.

La popolamaso intencis estigi abundon per rabado kaj brulado; la registaro volis ĝin gardi per galero kaj ŝnuro. La rimedoj estis inter si konvenaj; sed la leganto ja vidas kian rilaton ili havis kun la celo, kaj post nemulte li vidos, kion fakte ili efektivigis. Aliflanke, estas facile vidi, kaj ne senutile konsideri, kiel inter tiuj strangaj dispozicioj estas tamen

⁴ *analoj*: laŭjaraj historiaj raportoj.

⁵ *procesiis*: venis amase.

necesa interligo: ĉiu estis neevitebla konsekvenco de la antaŭa, kaj ĉiuj de la unua, kiu fiksis por la pano prezon tiel fora de la reala, tio estas de la prezo, kiu per si mem rezultus el la proporcio inter bezono kaj disponebla kvanto. Al la popolamaso tia solvo ĉiam nepre ŝajnis kaj ĝusta kaj simpla kaj facile praktikebla: estas do kompreneble, ke, en la necesoj kaj suferoj de malsatego, la popolo ĝin deziras, ĝin petegas, kaj, se pove, ĝin trudas. Sed, proporcie ke la konsekvencoj evidentiĝas, konvenas ke la devantoj klopodu ĉiun konsekvencon ripari, per leĝo malpermesanta fari tion, al kio la antaŭa leĝo kondukis. Estu al ni permesate noteti ĉi tie rimarkindan koincidon. En lando kaj epoko proksimaj, en la epoko la plej fama kaj plej renoma⁶ de la moderna historio, oni elpaŝis, en similaj cirkonstancoj, al similaj artifikoj (entute samaj laŭ-esence: nur kun malsamaj proporcioj, kaj preskaŭ laŭ la sama ordo) malgraŭ ke la epoko tiom multe ŝanĝiĝis, kaj ke la nocioj tiom multe kreskis en Eŭropo, kaj en tiu lando eble pli multe ol aliloke; kaj tio precipe ĉar la granda popolamaso, kiun tiuj nocioj ankoraŭ ne atingis, sukcesis trudi longtempe sian vidpunkton, kaj perforti, kiel oni tie diras, la manon de la leĝo-farantoj.

Tiele, se reveni al nia temo, ja du estis entute la ĉefaj fruktoj de tiu ribelo: fuŝado kaj efektiva perdo de proviantoj, dum la ribelo mem; malsobra, senpripensa, senmezura konsumado, dum validis la fiksprezo, el la malmulta greno, kiu ĉiuokaze devus sufiĉi ĝis la nova rikolto. Al ĉi tiuj ĝeneralaj efikoj aldoniĝu la pendumo de kvar malfeliĉuloj, kiel tumultestroj: du antaŭ la bakejo de la lam-bastonoj, kaj du

⁶ *fama kaj renoma*: la Franca Revolucio, okazinta longtempe (1789-1795) post la eventoj priskribitaj en la romano.

fine de la strato kie situis la domo de la proviantestro.

Cetere, la tiamaj historiaj raportoj estas faritaj tiel trafemaltrape, ke eĉ ne troviĝas sciigo, kiel kaj kiam finiĝis tiu perforta fiksprezo. Se, manke de pozitivaj sciigoj, licas proponi konjektojn, ni inklinas kredi, ke ĝi estis nuligita nemulte antaŭ aŭ post la 24-a de decembro, kiu estis la tago de tiu ekzekuto. Kaj koncerne la kriaĵojn, post la lasta, kiun ni citis, de la 22-a de la sama monato, ni ne trovas aliajn koncerne proviantojn; ĉu pro tio ke ili pereis, aŭ ĉar ilin maltrafis niaj esploroj, aŭ fine ĉar la registaro, deprime, se ne instruite, per la senefikeco de tiaj rimedoj, kaj supervenkite de la eventoj, lasis ĉi-lastajn iri propra-flue. Male ni trovas en la raportoj de pli ol unu historiisto (pro tio ke ili plimulte inklinis priskribi grandajn eventojn, ol noti iliajn kaŭzojn kaj evoluon) la priskribon de la lando, kaj ĉefe de la urbo, jam dum plena vintro kaj printempo, kiam la kaŭzo de la malbono, tio estas la misproporcio inter la haveblaj nutrovaroj kaj ties bezono, ne nuligite, sed eĉ pliigite per la rimedoj provizore interrompintaj ties efikojn, kaj ankaŭ pro la nesufiĉa importo de eksterlandaj grenaĵoj, kiun malhelpis malsufiĉo de privataj kaj publikaj transportiloj, malsato en la ĉirkaŭaj landoj, nesufiĉeco, malrapideco kaj limigoj de la komerco, kaj la leĝoj mem, celantaj estigi kaj gardi malaltajn prezojn, kiam ja la vera kaŭzo de la malsatego, aŭ pli ĝuste la malsatego mem, jam aktivis senbremse per sia tuta forto. Kaj jen kopio de tiu ĉagrena portreto.

Ĉiupaŝe, fermitaj butikoj; la fabrikoj grand-parte dezertaj; la stratoj, ne direbla spektaklo, senĉesa fluo de mizeroj, ĉiamdaŭra scenejo de suferoj. La profesiaj almozuloj, fariĝinte minoritataj, miksite kaj disperdite en nova homamaso, nun

estis devigataj konkur-kvereli pri almozo foje kun tiuj mem, el kiuj alifoje ili ricevis ĝin. Knaboj kaj junuloj maldungitaj de la butikmastroj, kiuj, ĉe malpliigo aŭ tuta malapero de la ĉiutaga gajno, apenaŭ vivtenis sin el la ŝparaĵoj kaj el la kapitalo; eĉ mastroj, por kiuj la ĉeso de laboroj kaŭzis bankroton kaj ruinon; laboristoj, kaj ankaŭ majstroj de ĉiaj fabrikoj kaj metioj, el plej komunaj kaj el plej rafinitaj, el plej necesaj kaj el plej luksaj, vagantaj de pordo al pordo, de strato al strato, apogite al la stratanguloj, kaŭraj sur la ŝtonplatoj, flanke de domoj kaj preĝejoj, mizere almozpetante, aŭ hezitante inter bezono kaj ankoraŭ ne regata honto, mincaj, langvoraj, tremantaj de malvarmo kaj malsato en vestaĵoj konsumitaj kaj malsufiĉaj, sed kiuj ĉe multaj gardis signojn de iama bonstato; samkiel eĉ en senaktiveco kaj deprimiĝo plu aperis iaj indicoj de iamaj laboremaj kaj senĝenaj kutimoj. Miksite inter la kompatinda homamaso, kaj ne eta parto de ĝi, servistoj maldungitaj de mastroj tiam falintaj el meznivelo al malabundo, aŭ kiuj, kvankam tre bonstataj, troviĝis en tiu jaro malebligataj plu teni tian kutiman pompan sekvantaron. Kaj al ĉiuj ĉi senhavuloj aldoniĝu aro da aliaj, grandparte kutimaj vivi el la gajnoj de ĉi tiuj: infanoj, virinoj, maljunuloj, societe kun siaj iamaj vivtenantoj, aŭ disaj aliloke almozpete.

Estis ankaŭ, kaj distingiĝis pro la taŭzitaj hartufoj, pro la luksaj ĉifonoj, aŭ eĉ pro tiu speco de marko, kiun moroj stampas en la vizaĝoj, des pli reliefa kaj klara ju pli strangas la moroj mem, multaj el la specio de l' bravuloj kiuj, perdinte, pro la komuna situacio, sian krimecan panon, kolektis ĝin almozpete. Venkitaj de malsato, konkurante kun aliuloj nur pri petegoj, timigitaj, ensorĉitaj, ili sin trenaĉis tra la stratoj, kie tiom longe ili iam promenis kun levita kapo, kun suspektema

kaj kruela rigardo, vestite per riĉaj kaj bizaraj livreoj, kun grandaj plumoj, garnite per riĉaj armiloj, rafinite kaj parfumite; kaj nun ili etendis humile la manon, kiun ili multfoje iam levis spite por minaci aŭ perfidema por vundi.

Sed eble plej aĉa kaj samtempe plej kompatinda spektaklo estis la kampuloj, izole, duope, familiope; edzoj, edzinoj, kun infanoj tenataj enbrake aŭ surdorse, kun knaboj mankondukataj, kun olduloj venantaj malantaŭe. Iuj, pro tio ke iliaj domoj estis invaditaj kaj prirabitaj de la soldataro tie loĝigita aŭ pasloĝanta, estis forkurintaj malespere; kaj kelkaj inter ĉi-lastaj, por pli multe kompatigi, kaj kvazaŭ por sian mizeron distingi, montris la bluaĵojn kaj cikatrojn de la batoj, kiujn ili ricevis defendante siajn lastajn proviantojn, aŭ por eskapi el blinda kaj brutala senbrideco. Aliaj, evitinte tiun apartan plagon, sed instigite de la du aliaj plagoj, el kiuj neniu angulo restis imuna, nome la sterileco, kaj la impostoj pli ol iam ajn ekscesaj, por plenumi tion, kion oni nomis la militaj bezonoj, estis venintaj kaj plu venis en la urbon, kiel al antikva loĝejo kaj lasta rifuĝejo de riĉeco kaj de pia donacemo. Distingis la ĵus venintojn, pli ol la malsekura irmaniero kaj nova mieno, la miro-plena kaj agacita teniĝo, pro tio ke ili trovis tian amasegon, tian rivalecon de mizero, ĝuste tie, kie ili imagis prezenti sin unikaj kompatinduloj, kaj altiri al si mem rigardojn kaj helpojn. La aliaj, kiuj jam pli-malpli longe vagis kaj loĝis en la urbaj stratoj, vivtenante sin per la subvencioj ricevataj, aŭ trovitaj kvazaŭ lote, en tia misproporcio inter rimedoj kaj bezono, havis pentrita en la vizaĝoj kaj la gestoj pli nigran kaj lacan konsternon. Diverse vestitaj, tiuj kiujn oni ankoraŭ povis diri vestitaj; kaj ankaŭ divers-aspektaj: paliĝintaj vizaĝoj el la malsupra ebenaĵo, sun-

brunaj tiuj el la meza ebenaĵo kaj la montetoj, sangoruĝaj la vizaĝoj de l' montaranoj; sed ĉiuj mincaj kaj taŭzitaĵoj, ĉiuj kun kavaj okuloj, kun fiksaĵoj rigardoj, inter strabaj kaj sensencaĵoj; taŭzitaĵoj la kapharoj, longaj kaj hirtaj la barboj: korpoj kreskintaĵoj kaj harditaĵoj en pena laboro, kaj nun elĉerpitaĵoj de la mizero; ŝrumpis la haŭto sur la sunbrulaj brakoj kaj la senkarnaj femuroj kaj brustoj videblaj tra la miskombinitaĵoj ĉifonoj. Kaj alimaniere, sed ne malpli ĉagrene ol tiu ĉi disbatita fortikeco aspektis, ĉe la malpli fortaj sekso kaj aĝoj, la aspekto de pli frue venkita kompleksio, kaj de pli cedemaj langvoro kaj elĉerpiĝo.

Dise tra la stratoj, tuŝe al la dom-muroj, iom da pajlo pistita, trivita kaj miksa kun malpuraĉa fatraso. Kaj eĉ tia abomenaĵo estis donaco kaj zorgo de karitato; estis kuŝejoj pretigitaĵoj por kelkiu el tiuj mizeruloj, por tie demeti la kapon dumnokte. De temp' al tempo oni vidis eĉ dumtage tie kuŝiĝi iun, al kiu laceco aŭ fastado forigis la fortojn kaj senfortikigis la kruojn: foje tiu mizera litaĉo surhavis kadavron; foje oni vidis iun fali subite kvazaŭ ĉifono, kaj resti senviva surpavime.

Apud kelke el tiuj kuŝejoj, oni ankaŭ vidis klinita pasanton aŭ najbaron, altiritan de subita kompato. Kelkloke aperis helpo aranĝita kun pli long-vida zorgo, gvidate de mano rimedo-riĉa kaj kutima bonfari grand-proporcio; kaj temis pri la mano de la bonkora Federigo. Li estis elektinta ses pastrojn, kies vivan kaj konstantan karitaton akompanis kaj servis fortika kompleksio; li dissendis ilin po du, kaj al ĉiu paro li asignis trionon de la urbo por trairi, akompanate de portistoj kun diversaj nutraĵoj, kun aliaj pli delikataĵoj kaj pli pretaj refortigaĵoj, kaj kun vestoj. Ĉiumatene la tri paroj survojiĝis

diversdirekten, aliris al la homoj, kiujn ili vidis forlasitaj surgrunde, kaj al ĉiu ili donis helpon laŭbezone. Kelkiu jam agonia, kaj ne plu kapabla ricevi nutraĵon, ricevis la lastajn helpojn kaj konsolojn de la religio⁷. Al la malsatuloj ili disdonis supon, ovojn, panon, vinon; al aliaj, elĉerpitaj de pli longa fastado, ili prezentis konsomeojn⁸, koncentritajn trinkaĵojn, pli bonkvalitan vinon, ilin reaniminte, se bezone, per likvoraj refortigaĵoj. Samtempe ili disdonis vestaĵojn por la plej hontaj kaj ĉagrenaj nudaĵoj.

Sed ne ĉe tio finiĝis ilia asistado: la bona paŝtisto⁹ volis, ke laŭeble tio alportu efektivan kaj ne momentan helpon. Al la mizeruloj, al kiuj tiu unua refreŝigo redonis fortojn sufiĉajn por stari kaj marŝi, ili donis iom da mono, por ke denova bezono kaj manko de alia helpo ne baldaŭ refaligu ilin en la antaŭan staton; por la aliaj ili serĉis gastigon kaj vivtenon en unu el la proksimaj domoj. Hejme de la bonstatuloj, ili estis plejofte gastigataj senpage, pro karitato, rekomendite de la kardinalo; en aliaj, kie al la bonintenculoj mankis la rimedoj, tiuj pastroj petis akcepti la malriĉulon pensione¹⁰, fiksita la prezon kaj tuj elpoŝigis unuan parto-pagon. Poste ili transdonis la liston de ĉi tiuj gastigitoj al la parokestroj, por ke ili vizitu ilin; kaj ili mem revenis ilin viziti.

Superfluas diri ke Federigo ne limigis siajn zorgojn al ĉi tiaj ekstremaj suferadoj, nek atendis tiaĵojn por kortuŝiĝi. Tiu arda kaj plurfaceta karitato devis ĉion konscii, ĉiamaniere

⁷ *helpojn kaj konsolojn de la religio*: kristanaj preĝoj kaj ritoj por mortantoj.

⁸ *kosomeojn*: densajn, tre nutrajn buljonojn.

⁹ *bona paŝtisto*: kardinalo Federigo.

¹⁰ *pensione*: gastigante kontraŭpage.

klopodi, ripari tie, kie ne eblis preventi, alpreni, se tiel diri, la formojn, laŭ kiuj variis la bezonado. Fakte, kunigante ĉiujn siajn rimedojn, igante pli rigora la ŝparadon, tuŝante ŝparaĵojn destinitajn al aliaj donacaj iniciatoj, nun fariĝintaj duarangaj, li ĉiumaniere klopodis havigi al si monon, por ĝin tute investi helpe al malsatuloj. Li jam faris grandajn aĉetojn de grenaĵoj, kaj sendis parton de ili al la plej bezon-havaj lokoj de la diocezo; kaj ĉar la helpo estis tro eta kompare kun la bezono, li sendis ankaŭ salon, «per kiu», diras Ripamonti, raportante la aferon, «herboj de herbejo kaj ŝeloj de arboj konvertighas al nutrajho». Grenaĵojn kaj monon li disdonis ankaŭ al la parokestroj de la urbo; li mem vizitis ĝin, kvartalon post kvartalo, disdonante almozojn; li helpis sekrete al multe da malriĉaj familioj; en la ĉefepiskopejo, kiel atestas tiutempa verkisto, nome kuracisto Alessandro Tadino, en sia *Raporto*, kiun ofte ni havos la oportunon citi plu-rakontante, oni disdonis ĉiumatene du mil tasojn da rizo-supoj.

Sed ĉi tiuj karitataj fruktoj, kiujn ni ja rajtas difini grandiozaj, konsidere, ke ili devenis de unu nura viro, kaj nur el liaj personaj mon-rimedoj (ĉar Federigo principe rifuzis fariĝi transdonanto de alies donacoj); ĉi-tiuj, kune kun la malavaraĵoj de aliaj privataj manoj, se ne tiel abundaj, tamen multnombraj; kune kun la subvencioj, kiujn la Konsilio de l' dekestroj dekretis, donante al la provianto-tribunalo la taskon ilin disdoni, estis ankoraŭ tro malmulte, kompare kun la bezono. Dum al kelke da montaranoj, jam mortontaj de malsato, la kardinala karitato pli-longigis la vivon, aliaj atingis tiun ekstremon; la unuaj, post tiu limigita helpo, refalis; aliloke aliaj krizaj situacioj, ne forgesitaj sed prokrastitaj, de tiu karitato devigita elekti, kiel malpli urĝaj, fariĝis

mortodanĝeraj; ĉiuloke oni pereis, el ĉiu direkto oni rifuĝ-amasiĝis en la urbon. Ĉi tie du miloj da malsatuloj, ni supozu, pli fortikaj kaj pli spertaj supervenki la konkurencon kaj trabati al si lokon, konkeris unu supon, sufiĉe por ne morti tiutage; sed pluraj aliaj miloj postrestis, enviante tiujn, ĉu ni diru pli feliĉajn, kiam inter la postlasitoj estis ofte iliaj edzinoj, gefiloj, aŭ patroj? Kaj dum en kelkaj urbo-partoj oni iujn el plej forlasitaj kaj jam mortontaj levis degrunde, reanimis, gastigis, kaj provizis por iom da tempo; en cent aliaj partoj aliaj falis, langvoris, aŭ eĉ mortis, sen helpo, sen refreŝigo.

Tuttage aŭdiĝis tra la stratoj konfuza zumado de petegantaj voĉoj; dumnokte, ĝemo-flustrado, rompita de temp' al tempo de subitaj laŭtaj lamentoj, de kriegoj, de profundaj petegaj akcentoj, kiuj finiĝis per akutaj krioj.

Estas rimarkinde ke, en tiom da ekscesaj mizeroj, en tiom da diversaj plendoj, neniam vidiĝis provo, nek ellasiĝis krio de ribelo: aŭ almenaŭ pri tio ne troviĝas eĉ plej eta aludo. Kaj tamen, inter tiuj kiuj vivis kaj mortis tiumaniere, estis alta nombro da personoj edukitaj tute alie ol al toleremo; troviĝis pluraj centoj el tiuj mem, kiuj, en la tago de sankta Marteno, tiom laŭte aŭdigis sian voĉon. Kaj ne imageblas, ke ĉiujn bremsis la ekzemplo de la kvar ekzekutitaj malfeliĉuloj, kiuj elpasis por ĉiuj: kian influon do povus havi, ne la ĉeesto, sed la nura memoro de ekzekutoj super la animoj de vagabonda hom-amaso, kiu vidis sin kondamnita al lanta torturo kaj kiu jam suferis ĝin? Sed ĝenerale ni, la homoj, estas tiaj: ni ribelas indigne kaj furioze kontraŭ la meznivelaj malbonoj, kaj ni klinas nin silente sub la ekstremaj; ni eltenas, ne rezignacie sed senkonscie, la kulminon de tio, kion ni komence difinis neeltenebla.

La malpleno, kiun la mortado ĉiutage estigis en tiu plorinda homamaso, estis ĉiutage pli ol plenigata: estis kontinua almigro, unue el la ĉirkaŭaj vilaĝoj, poste el la tuta kamparo, pli poste el urboj landaj, fine eĉ alilandaj. Kaj dume, ankaŭ de ĉi tie ekiris ĉiutage iamaj loĝantoj; iuj por eskapi el la vido de tiom da plagoj; aliaj, vidante, se tiel diri, sian postenon okupita de aliaj almoz-konkurantoj, eliris, por lasta malespera provo helpo-peti ie ajn aliloke, kie almenaŭ ne estos tiom densaj kaj premaj popolamaso kaj almoz-rivaleco. La dudirektaj migrantoj renkontiĝis en sia opozicia vojaĝado, reciproke forpuŝa spektaklo, kaj ĉagrena specimeno, sinistra aŭguro pri la celoj, al kiuj unuj kaj aliaj vojaĝis. Sed ambaŭ grupoj pluiris sian vojon, se ne plu esperante sian sorton ŝanĝi, almenaŭ por ne reveni sub ĉielon, kiu fariĝis abomena, por ne revidi la lokojn de sia malespero. Sed kelkaj el ili, pro tuta senfortiĝo, falis survoje, kaj tie restis mortinte: eĉ pli sinistra spektaklo por siaj samsortanoj, objekto de hororo kaj eble de riproĉo por la aliaj vojaĝantoj. «Vidis mi», skribas Ripamonti, «en strato, kiu chirkauas muregojn, kadavron de virino... Elstaris el shia busho duone ronghita herbo, kaj lipoj ankoraŭ faris kvazau rabian klopodon... Shi havis surshultre volvajhon, kaj ligita per vindoj al brusto infanon, kiu plorante petis mamon... Kaj alvenis kompatemaj personoj, kiuj, levinte povruleton de grunde, lin forportis, tiel plenumante unuan patrinan oficon».

La kontrasto de galanterioj¹¹ kaj ĉifonoj, superfluaĵo kaj mizero, ordinara spektaklo en ordinara tempo, jam tute ĉesis. Ĉifonoj kaj mizero estis preskaŭ ĉiuloke; kaj tio, kio distingiĝis, estis apenaŭa mezniveleco. Oni vidis nobelojn

¹¹ *galanterioj*: riĉaj kaj lukse garnitaj vestaĵoj.

marŝi en vesto simpla kaj modesta, aŭ eĉ konsumita kaj aĉa; iuj, pro tio ke la komunaj kaŭzoj de mizero tiel ŝanĝis ankaŭ ilian fortunon, aŭ bankrotigis iliajn jam aĉajn havaĵojn: aliaj, aŭ pro tio ke ili timis iriti per sia lukso la publikan malesperon, aŭ ĉar ili hontis insulti la publikan plagon. Tiuj malamataj kaj respektataj perfortuloj, kutimaj ĉirkaŭmarŝi kun sekvantaro el bravuloj, nun marŝis preskaŭ solaj, kun mallevita kapo, kun mienoj kiuj ŝajnis proponi kaj peti pacon. Ankaŭ aliaj, kiuj dum prospera tempo havis pli humanajn pensojn kaj pli modestajn teniĝojn, ŝajnis konfuzaj, konsternitaj, kaj kvazaŭ supervenkitaj vidante mizeron, kiu superis ne nur la eblecon de helpo, sed, mi dirus, eĉ la forton de kompatato. La homo, kiu povis doni iom da almozo, devis tamen fari abomenan elekton inter malsato kaj malsato, inter urĝo kaj urĝo. Kaj tuj kiam vidiĝis mano kompatema proksimiĝi al la mano de malfeliĉulo, estiĝis ĉirkaŭe konkuro de aliaj malfeliĉuloj; tiuj al kiuj restis pli da fortiko, trabatis al si vojon por peti pli insiste; la jam senfortaj, la maljunuloj, la infanoj, levis la senkarnajn manojn; patrinoj levis kaj montris de malproksime la infanojn plorantajn, aĉe envolvitajn en ĉifonaj vandoj, kaj pro langvoro kuntiritajn en la patrinaj manoj.

Tiel pasis la vintro kaj la printempo; kaj jam delonge la sanitara tribunalo atentigis la provianto-tribunalon pri l' risko de kontaĝo, kiu minacis la urbon, pro tiom da mizero ĉie en ĝi amasigita; kaj ĝi proponis kolekti la almozulojn en diversajn gast-lokojn. Dum oni pridiskutas tiun ĉi proponon, dum oni ĝin aprobas, dum oni cerbumas pri la rimedoj, la manieroj, la lokoj, por ĝin efektiviĝi, la kadavroj pli kaj pli multiĝas surstrate, kaj proporcie plu kreskas ĉiaj aliaj mizeroj. En la

provianto-tribunalo oni proponas, kiel pli facilan kaj pli rapidan, alian rimedon: nome kolekti ĉiujn almozulojn, sanajn kaj malsanajn, en unu nuran lokon, nome en la lazareton, kie ili estu nutrataj kaj flegataj je publikaj elspezoj; kaj tiel estas rezoluciite, kontraŭ la starpunkto de la Sanitara konsilio, kiu objctis ke, en tioma amasiĝo, plu kreskos la danĝero, kiun oni intencas ripari.

La Milana lazareto (se hazarde ĉi tiu historio trafus en la manojn de homo ne konanta ĝin, nek vide nek priskribe) estas kvar-latera, preskaŭ kvadrata ĉirkaŭbaraĵo, ekster la urbo, maldekstre de la tiel nomita Orienta pordego, distanca de la muregoj la spacon de unu fosaĵo, unu ĉirkaŭvojo, kaj unu kanalo, kiu ringas la ĉirkaŭbaraĵon mem; la du pli longaj lateroj mezuras ĉirkaŭ kvincent paŝojn, la du aliaj, eble minus dek kvin; ĉiuj lateroj havas eksterflanke serion da unuetaĝaj ĉeloj; dum interne tri laterojn ĉirkaŭas kontinua volba portiko, subtenata per etaj kaj maldikaj kolonoj.

La ĉeloj estis proksimume ducent okdek ok; nunepoke unu granda aperturo farita meze, kaj alia malgranda en unu angulo de la fasado de la latero laŭlonge de la ĉefvojo, forigis mi ne scias kiom da ili. Epoke de nia historio, estis nur du enirejoj: unu meze de la flanko kiu rigardas la urbajn muregojn, la dua en la kontraŭa flanko. Centre de la interna spaco, estis, kaj ankoraŭ estas, oklatera preĝejo.

La unua celo de la tuta konstruaĵo, komencita en la jaro 1489-a, per la mono de privata legaco¹², kaj poste daŭrigita per mono publika kaj de aliaj privataj testamentintoj kaj donacintoj, estis, kiel aludas la nomo mem, loĝigi, se necese, trafitojn de pesto; kiu jam multe antaŭ tiu epoko, kaj longe

¹² *legaco*: parto de heredaĵo destinita por aparta persono aŭ celo.

post ĝi, kutimis aperi du, tri, kvar, ses, eĉ ok fojojn ĉiujarcente, jen en unu jen en alia Eŭropa lando, foje trafante grandan parton de ĝi, alifoje trairante ĝin ĉiudirekte. En la momento, kiun ni pritraktas, la lazareto rolis kiel deponejo de kvarantenaj varoj.

Nu, por ĝin malplenigi, oni ne observis rigore la sanitarajn leĝojn, kaj, farinte rapide la preskribitajn desinfektojn kaj ekspertizojn, oni per unu fojo forpermesis ĉiujn varojn. Oni sternigis pajlon en ĉiuj ĉeloj, oni provizis proviantojn laŭ kvalito kaj kvanto tiam eblaj; kaj oni invitis, per publika edikto, ĉiujn almozulojn transloĝiĝi tien.

Multaj alrapidis volonte; oni tien transportis ĉiujn malsanulojn kuŝantajn ĉe la stratoj kaj sur la placoj; en malmulte da tagoj amasiĝis, el la unuaj kaj la duaj, pli ol tri mil homoj. Sed ege pli multaj restis ekstere. Aŭ ĉar ĉiu el ili esperis vidi la aliajn foriri, kaj tiel resti malmultaj por ĝui la almozojn de la urbo, aŭ pro la natura malinklino al fermiteco, aŭ pro la malfidemo de l' malriĉuloj kontraŭ ĉio, kion proponas riĉuloj kaj potenculoj (malfidemo ĉiam proporcia kun la komuna malscio ĉu de tiuj kiuj ĝin sentas ĉu de tiuj kiuj ĝin inspiras, proporcia kun la kvanto da malriĉuloj, kaj kun la malsaĝeco de la leĝoj), aŭ pro l' objektiva konscio pri la kvalito de la proponata avantaĝo, aŭ pro ĉio ĉi sume, aŭ pro ajna alia kialo, fakte estas, ke plej granda parto, ignorante la inviton, plu sin trenaĉis tra la stratoj. Tion konstatinte, oni taksis konvene transi de invito al perforto. Oni dissendis patrole ĝendarmojn, kiuj pelu la almozulojn al la lazareto, kaj tien konduku ligitaj la rezistantojn; kaj por ĉiu el ili estis asignita dek-groŝa premio: vidu ĉu ĉiam troveblas da publika mono por investi plej fuŝe, eĉ dum pleja mizerego. Kaj

kvankam, kiel konjektis kaj eĉ malkaŝe intencis la Proviantkonsilio, ia kvanto da almozuloj forlasis la urbon, por iri vivi aŭ morti aliloke, sed almenaŭ en libereco; tamen la ĉasado estis tia ke, en malmulte da tempo, la nombro da loĝigitoj, inter gastoj kaj kaptitoj, proksimiĝis al dek mil.

Virinoj kaj infanoj supozinde estis loĝigitaj en apartaj sekcioj, kvankam la tiuepokaj memor-rakontoj pri tio nenion diras. Reguloj kaj dispozicioj por bonordo, ni supozas ke certe ne mankis; sed ĉiu imagu kian ordon eblis starigi kaj gardi, speciale en tiu epoko kaj tiaj cirkonstancoj, en tiel vasta kaj varia hom-amaso, kie kune kun volontuloj troviĝis devigitoj; kun tiuj kies almoz-petado estis neceso, ĉagreno, honto, estis aliaj por kiuj ĝi estis metio; kune kun multaj kreskintaj en la honesta laboro de l' kampoj kaj uzinoj, multaj aliaj estis edukitaj al mallaboremo, trompado, insultado, perforto en la placoj, la tavernoj, la palacoj de l' perfortuloj.

Kiel ĉiuj fartis rilate loĝejon kaj nutraĵon, eblas bedaŭrinde konjekti, eĉ se ni ne havus pozitivajn informojn; sed ni havas ilin. Oni dormis amasigite dudekope, tridekope en ĉiu el tiuj ĉeleteoj, aŭ buliĝinte sub la portikoj, sur iom da putra kaj fetora pajlo, aŭ sur la nuda grundo: ĉar estis ja ordonite ke la pajlo estu freŝa kaj sufiĉa, kaj ofte ŝanĝita; sed fakte ĝi estis aĉa, malsufiĉa, kaj oni ne ĝin ŝanĝis. Estis same ordonite ke la pano estu bonkvalita: ĉar, kiu administranto iam ajn diris ke oni faru kaj disdonu aĉaĵon? sed tion, kion oni ne sukcesus en ordinaraĵoj, por eĉ malpli vasta servo, kiel efektiviĝi en tiu kazo, kaj por tiu amasego? Oni tiam diris, kiel ni legas en la memoraĵoj, ke la pano de la lazareto estas adulterita¹³ per pezaj kaj ne nutraj ingrediencoj: kaj

¹³ *adulterita*: fuŝita per aldono de ne nutraj substancoj.

bedaŭrinde kredeblas ke ne temis pri senbazaj plendoj. Eĉ da akvo estis malsufiĉe; mi intencas diri akvon vivan kaj sanan: kiel komuna puto devis roli la ĉirkaŭmura kanalo, malprofunda, malrapida, ie eĉ ŝlima, kaj poste tia, kia povus ĝin igi la uzado kaj proksimeco de tiomnombra kaj tiuspeca hom-amaso.

Al ĉiuj ĉi kaŭzoj de mortado, des pli efikaj, pro tio ke ili agis en malsanaj aŭ malsanetaj korpoj, aldoniĝu la plej aĉa vetero: obstinaj pluvoj, kiujn sekvis eĉ pli obstina sekeco, kaj kun ĝi anticipa kaj perforta varmego. Al la malbonoj aldoniĝu la sento pri l' malbonoj mem, la tedo kaj streĉiteco pro l' mallibereco, la memoro pri l' iamaj kutimoj, la bedaŭro pro la pereintaj karuloj, la maltrankvila memoro pri l' foraj karuloj, la reciproka turmento kaj forpuŝo, multe da aliaj pasioj el deprimiĝo aŭ rabio, tien alportitaj aŭ estiĝintaj tie; kaj krome la ansio kaj la kontinua spektaklo de morto, kiun tiom da kaŭzoj plimultigis, kaj kiu mem fariĝis nova kaj potenca mort-kaŭzo. Kaj ne mirigos tio, ke la mortado kreskis kaj regis interne de tiu baraĵo tiagrade, ke ĝi alprenis aspekton, kaj ĉe multaj nomon, de pestepidemia¹⁴: aŭ ĉar la amasiĝo kaj kresko de ĉiuj-ĉi kaŭzoj pli-aktivigis la efikon de simpla epidemiaĵo; aŭ ĉar (kiel ŝajnas okazi eĉ ĉe malsatoj malpli gravaj kaj malpli longaj ol tiu) okazis ia kontaĝo, kiu, ĉe l' korpoj afekciitaj kaj disponitaj per la mizero kaj la aĉa nutrado, pro la veteraĉo, la malpuraĵo, la aflikto kaj la deprimiĝo, trovas taŭgan medion, se tiel diri, kaj oportunan momenton, entute la necesajn kondiĉojn por naskiĝi, nutriĝi, kaj multobliĝi (se licas al malklerulo skribaĉi tiujn ĉi vortojn, laŭ hipotezo

¹⁴ *pestepidemia*: epoke de Manzoni la medicinistoj distingis inter epidemia, disvastiĝanta senkontakte, kaj proprasenca kontaĝo.

proponita de iuj medicinistoj kaj laste reproponita, kun multe da argumentoj kaj tre modeste, fare de diligenta kaj same talenta viro¹⁵): aŭ ĉar la kontaĝo komence eksplodis en la lazareto mem, kiel, el malklara kaj ne ekzakta raporto, ŝajnas ke opiniis la medicinistoj de la Sanitara administracio; aŭ ĉar ĝi eble jam antaŭe vivis kaj inkubaciis (kio plej multe verŝajnas, se pensi ke la malbonstato estis jam delonga kaj ĝenerala, kaj la mortado jam ofta), kaj, portite en tiun konstantan hom-amason, ĝi disvastiĝis kun nova kaj terura rapideco. Kiu ajn veras el tiuj ĉi konjektoj, la ĉiutaga nombro da mortintoj en la lazareto superis en malmulte da tempo unu centon.

Dum en tiu loko restis nur langvoro, angoro, teruro, bedaŭro kaj timtremo, en la Proviant-konsilio regis honto, konsterno, hezito. Oni diskutis, oni aŭskultis la starpunkton de la Sanitara administracio; oni nenion eltrovis, krom malfartion kion oni estis farinta kun tiom da ekipaĵo, tiom da elspezado, tiom da perfortoj. Oni malfermis la lazareton, oni ellasis ĉiujn ne malsanajn malriĉulojn, kiuj ankoraŭ tie restis, kaj kiuj forrapidis kun furioza ĝojo. La urbo denove resonis je l' iama lamentado, sed pli febla kaj interrompa; ĝi revidis tiun homamason malpli densa kaj, diras Ripamonti, pli kompatinda, ĉe l' penso, kiel ĝi tiom malkreskis. La malsanulojn oni transportis al Santa Maria della Stella, kiu tiam estis malriĉulejo; kie plej granda parto pereis.

Sed dume komencis tiuj benataj kampoj blondiĝi. La almozuloj venintaj el la kamparo foriris, ĉiu siahejmen, por tiu sopirata rikolto. La bonkora Federigo ilin forsalutis kun lasta

¹⁵ *talenta viro*: Manzoni aludas sian amikon, nome doktoron Enrico Acerbi, taksatan unu el la pioniroj de mikrobiologio.

klopodo kaj nova karitata eltrovaĵo: al ĉiu kampulo, kiu sin prezentis al la ĉefepiskopejo, li donacigis unu julio-moneron kaj unu falĉilon.

Kun la rikolto, ĉesis fine la malsatego: la mortado, epidemia aŭ kontaĝa, malkreskante tagon post tago, daŭris tamen ĝis la aŭtuno. Kiam ĝi estis ĉe l' fino, jen ekestis nova plago.

Multe da gravaj aferoj, el tiuj kiujn oni pli speciale titolas historiaj, jam okazis intertempe. Kardinalo Richelieu, kaptinte, kiel ni diris, Roĉelon, kombininte laŭpovan pacon kun la reĝo de Anglujo, estis proponinta kaj persvadinta per sia potenca parolo en la reĝa Konsilio de Francujo, doni efikan helpon al la Neversa duko; kaj samtempe li decidigis la reĝon mem gvidi la ekspedicion. Dum oni faris la koncernajn preparojn, la grafo de Nassau, imperiestra komisaro, en urbo Mantova al la nova duko¹⁶ ordonegis, ke li liveru la ŝtatojn al Ferdinando¹⁷, aŭ ĉi lasta sendos armeon por ilin okupi. La duko, kiu en pli malesperaj cirkonstancoj malakceptis tiel akran kaj suspektindan kondiĉon, nun, kuraĝigite de la baldaŭa helpo de Francujo, des pli forte rifuzis ĝin; sed tion li faris per terminoj, en kiuj la neo estu laŭpove ĉirkaŭfrazata kaj prokrastata, kaj kun promesoj de submetiĝo eĉ pli malkaŝa, sed malpli kosta. La komisaro foriris, al li deklaregante, ke oni elpaŝos per forto. En marto kardinalo Richelieu fakte desupris en Italujon, kune kun la reĝo ĉe l' fronto de armeo: li petis paspermeson de la Savoja duko; oni intertraktis; oni ne akordiĝis; post interbato, kun venko de l' Francoj, oni denove intertraktis, kaj finaranĝis per akordo, laŭ kiu la duko interalie konsentis ke la

¹⁶ *la nova duko*: la Neversa duko.

¹⁷ *Ferdinando*: tiama imperiestro.

Cordovano malsieĝu Casale-n, devigante sin, se li tion rifuzos, kuniĝi kun la Francoj, por invadi la Milanian duklandon. Don Gonzalo, taksante, ke li elturniĝas malkare, malsieĝis Casale-n, kien tuj eniris korpuso de Francoj, por plifortikigi la garnizonon.

Ĝuste tiuokaze Achillini¹⁸ verkis por reĝo Ludoviko sian faman soneton¹⁹:

Vi ŝvitu, fajroj, por metalojn fandi:

kaj alian, per kiu li instigis lin al tuja ekspedicio por liberigi la sanktan Landon. Sed estas destine, ke l' konsiloj de l' poetoj restu senaŭskultaj: kaj se vi trovas en la historio faktojn konformajn al iliaj sugestoj, diru ja libere, ke temis pri aferoj deciditaj anticipe. Kardinalo Richelieu siaflanke jam decidis reveni en Francujon, por aferoj, kiuj al li ŝajnis pli urĝaj. Girolamo Soranzo, sendito de l' Venecianoj, ja prezentis rezonojn por kontraŭstari tiun decidon; sed la reĝo kaj la kardinalo, lian prozon konsiderante same serioze kiel la versojn de Achillini, revenis kun la ĉefa forto de l' armeo, lasante nur ses mil virojn en Susa, por gardi la pasejon, kaj kiel garantiaĵon de la traktato.

Dum tiu armeo foriris unuflanke, tiu de Ferdinando proksimiĝis aliflanke; ĝi jam invadis Grizonon kaj Valtellinan; ĝi sin pretigis desupri en Milanion. Krom ĉiuj damaĝoj timindaj el tia trapaso, alvenis malkaŝaj avertoj al la Sanitara

¹⁸ *Achillini*: Claudio Achillini (1574-1640), itala baroka poeto.

¹⁹ *soneto*: fiksforma poemo el 14 versoj.

tribunalo, ke en tiu armeo inkubacias pesto, kiu tiuepoke estis intermita en la germanaj trupoj, kiel diras Varchi²⁰, parolante pri la pesto de ili alportita en Florencon antaŭ unu jarcento. Alessandro Tadino, unu el la Sanitaraj kuratoroj (ili estis ses, krom la prezidanto: kvar juĝistoj kaj du kuracistoj), estis komisiita de la tribunalo, kiel li mem rakontas en la jam citita raporto, prezenti al la guberniestro la teruran danĝeron kiu minacis la landon, se tiu soldataro pasos tra tie, por iri sieĝi urbon Mantova, laŭ disaj onidiroj. El ĉiuj kondutoj de Don Gonzalo konjekteblas, ke li deziregis akiri lokon en la historio, kiu fakte ne povis lin neglekti; sed la historio (kiel ofte okazas) ne konis, aŭ neglektis registri lian plej memorindan faron, nome la respondon kiun li donis al Tadino tiuokaze. Li respondis, ke li ne scias kion fari; ke la intereso kaj honoro, pro kiuj ekmarŝis tiu armeo, estas afero pli grava ol la prezentita danĝero; ke ĉiel ajn oni klopodu rimedi laŭpove, kaj oni esperu en la Dia Providenco.

Por rimedi do laŭpove, la du kuracistoj de la Sanitara tribunalo (la menciita Tadino, kaj Senatore Settala, filo de la fama Lodovico) proponis en tiu tribunalo ke oni malpermesu kontraŭ severegaj punoj aĉeti ĉiuspecajn varojn de l' baldaŭ pasontaj soldatoj; sed ne eblis komprenigi la neceson de tia ordono al la prezidanto, «viro», diras Tadino, «tre bonkora, kiu tute ne kredis, ke devos ekesti morto de tiom da miloj da homoj, el rilato kun tiuj personoj kaj iliaj havajhoj». Ni citas ĉi tiun fragmenton, kiel unu el tiuepokaj unikaĵoj: ĉar, ek de la ekzisto de sanitara tribunaloj, neniam okazis ke alia prezidanto faris rezonadon tian; se oni rajtas nomi ĝin rezonado.

²⁰ *Varchi*: historiisto (1503-1565).

Koncerne Gonzalon, li foriris de Milano nemulte post tiu respondo; kaj la foriro, same kiel ties kaŭzo, estis por li malĝoja. Oni lin eksigis pro la malsukcesoj en la milito, kiun li iniciatis kaj estris; kaj la popolo lin kulpigis pri la malsato suferita dum lia regado. (Lian konduton koncerne la peston, aŭ oni ne sciis, aŭ certe neniu pri ĝi maltrankviliĝis, escepte de la sanitara tribunalo, kaj speciale la du kuracistoj). Ĉe lia eliro el la kortega palaco, sur vojaĝa kaleŝo, meze de halebardista gvardio, kun du rajdantaj trumpetistoj antaŭe, kaj aliaj kaleŝoj de nobeloj sekve, akceptis lin grandaj fajfoj de knaboj kolektiĝintaj sur la katedralan placon, kaj sekvantaj lin malorde. La veturantaro, enirinte la straton kondukantan al la Tiĉina pordego, tra kiu oni devis eliri, troviĝis meze de popolo, kiu parte jam atendis kaj parte tiam amasiĝis; des pli ĉar la trumpetistoj, formalismaj homoj, ne ĉesis trumpeti, ek de la kortega palaco ĝis la pordego. Kaj en la proceso, kiun oni pli poste faris pri tiu tumulto, unu el ili, riproĉite pro tio ke, per sia trumpetado, li kaŭzis kreskon de la tumulto mem, respondis: «Kara senjoro, chi tio estas nia profesio; kaj se Lia Eksc. ne shatus ke ni trumpetu, Ghi devus al ni ordoni silenti». Sed Don Gonzalo, aŭ malŝatante fari aferon, kiu montrus timon, aŭ timante igi per tio la amason pli aŭdaca, aŭ ĉar fakte li estis iom konsternita, nenian ordonon donis. La popolamaso, kiun la gardistoj vane provis repeli, antaŭis, ĉirkaŭis, sekvis la kaleŝojn, kriante: «foriras la malsato, foriras la sango de l' malriĉuloj», kaj eĉ pli aĉe. Kiam ili proksimiĝis al la pordego, ili komencis ankaŭ ĵeti ŝtonojn, brikojn, frukto-stumpojn, ĉiuspecajn ŝelojn, entute la kutimajn municiojn de tiaj ekspedicioj; parto de ili alkuris sur la muregojn, kaj de tie ili faris lastan malŝargon super la forveturantajn kaleŝojn. Tuj

poste ili disiĝis.

Anstataŭ Don Gonzalo estis sendita markizo Ambrogio Spinola, kies nomo jam akiris, en la militoj de Flandrujo, la militistan famon, kiu ankoraŭ al li restas.

Dume la germana armeo, sub la plej alta komando de grafo Rambaldo di Collalto, alia itala kondotiero, kun malplia sed ne lasta renomo, jam ricevis la definitivon ordonon marŝi ekspedie kontraŭ Mantova; kaj en la monato septembro ĝi eniris la Milanan duklandon.

La armeoj tiuepoke ankoraŭ konsistis el dungitaj soldatoj, kiujn varbis profesiaj kondotieroj, komisie de iu princo, foje eĉ propra-iniciate, por pli poste sin vendi kune kun ili. Pli ol la soldo²¹, la virojn allogis al tiu profesio la espero de disrabo kaj ĉiaj logaĵoj de senbrideco. Firma kaj ĝenerala disciplino mankis; nek ĝi povis facile akordiĝi kun la iom sendependa aŭtoritato de l' diversaj kondotieroj. Ĉi lastaj siaflanke, nek estis tre postulemaj koncerne disciplinon, nek videblas kiel, eĉ se ili volus, ili povus ĝin firmigi kaj gardi; ĉar tiuspecaj soldatoj aŭ ribelus kontraŭ la novisma kondotiero elpensanta malpermesi disrabadon; aŭ minimume ili lasus lin sola garde al la flagoj. Krom tio, ĉar la princoj, luante, se tiel diri, tiujn bandojn, plimulte zorgis havi sufiĉan kvanton da viroj, por sekurigi l' entreprenojn, ol proporciigi ilian nombron kun sia pago-kapablo, kutime tre modesta; tiele la pagoj venis plejofte malfruaj, po-parte kaj partete; kaj la rabaĵoj de la trafitaj vilaĝoj fariĝis kvazaŭ subkomprenita kompletiga krompago. Famas, preskaŭ kiel la nomo de Wallenstein, lia sentenco: ke pli facilas vivteni armeon el cent mil viroj, ol el dek du mil. Kaj ĉi tiu armeo, pri kiu ni parolas, konsistis el la viroj, kiuj,

²¹ *soldo*: salajro de dungitaj soldatoj.

sub lia komando, plagis Germanujon, en tiu milito fama inter militoj, en si mem kaj pro ties efikoj, kiu poste ricevis nomon el sia tridekjara daŭro: kaj tiam estis la jaro dekunua. Ĉeestis eĉ lia propra regimento, kiun kondukis unu el liaj leŭtenantoj; el la aliaj kondotieroj, plej granda parto estis komandinta sub li, kaj ĉeestis pluraj el tiuj kiuj, post kvar jaroj, lin helpos finaĉi la vivon, en la maniero kiun ĉiu konas²².

Temis pri dudek ok mil infanterianoj, kaj sep mil kavalerianoj; kaj, desuprante de Valtellina por atingi la Mantovan teritorion, ili devis sekvi la tutan fluon de Adda laŭ la du lago-branĉoj, kaj poste denove kiel rivero, ĝis ties enfluo en Po-riveron, kaj poste ili devis iom longe laŭbordi ĉi-lastan: entute oktaga marŝado tra la Milana duklando.

Granda parto de la loĝantoj rifuĝis sur la montojn, kunportante ĉion kion ili havis plej valoran, kaj pelante antaŭ si la brutojn; aliaj restis, aŭ por ne forlasi malsanulon, aŭ por ŝirmi la domon kontraŭ brulego, aŭ por gardi kaŝitajn, subterigitajn valoraĵojn; aliaj, ĉar ili havis nenion por perdi, aŭ eĉ kalkulis ion gajni. Ĉiufoje kiam la unua taĉmento atingis la etapo-vilaĝon, ĝi tuj disiĝis tra ĝi kaj tra la ĉirkaŭaj vilaĝoj kaj tute prirabis ilin: ĉio ĝuebla aŭ forportebla malaperis; la reston ili detruis aŭ fuŝis; la mebloj fariĝis brul-ligno, kaj la domoj, staloj: krom la batoj, la vundoj, la stuproj²³. Ĉiaj artifikoj, ĉiaj ruzoj por savi siajn havaĵojn, estis plejofte vanaj, kaj foje ili kaŭzis eĉ pli grandajn damaĝojn. La soldatoj, ja spertaj pri la stratagemoj²⁴ ankaŭ de ĉi-speca milito, traserĉis ĉiujn domajn

²² Kondotiero Wallenstein estis en 1634 kaptita kaj murdita de siaj kolegoj.

²³ *stuproj*: seksaj perfortoj.

²⁴ *stratagemoj*: militaj artifikoj.

anguletojn, senmurigis, malmasonis; ili facile rekonis en legomejoj la teron freŝe fositan; ili eĉ alsupris la montojn por ŝteli brutaron; ili eniris kavernojn, gvidate de vilaĝaj kanajloj, serĉe de eventuala riĉulo tie sin kaŝinta; ili trenaciis lin hejmen, kaj per torturo el minacoj kaj batoj, ili devigis lin indiki la kaŝitan trezoron.

Fine ili ekforiris; ili estis for; oni aŭdis malproksime sveni la tamburadon aŭ trumpetadon; sekvis kelkhora terur-plena kvieto; kaj poste denova malbenata tamburado, denova malbenata trumpetado anoncis alvenon de alia taĉmento. Ĉi-lastaj, ne plu trovante por predi, des pli furioze forfuŝis la reston, bruligis la barelojn malplenigitajn de la unuaj, la pordojn de la ĉambroj, kie nenio plu restis; ili eĉ fajrigis domojn; kaj des pli rabie ili kompreneble mistraktis la personojn; kaj tio pli kaj pli aĉe, dum dudek tagoj, laŭ la nombro de la taĉmentoj, kiuj konsistigis la armeon.

Colico estis la unua duklanda loko, kiun invadis tiuj demonoj; poste ili sin ĵetis sur Bellanon; de tie ili eniris kaj disiris tra Valsassina, de kie ili atingis la teritorion de Lecco.

XXIX

Ĉi tie, inter la povraj teruritoj, ni trovas ankaŭ personojn de ni konatajn.

Kiu ne vidis Don Abbondion, en la tago kiam disvastiĝis samtempe ĉiuj sciigoj pri l' invado de la armeo, ties proksimiĝo, ties fi-faroj, tiu ne tute scias, kio estas embaraso kaj teruro. Ili venas, ili estas tridek, estas kvardek, estas kvindek mil; ili estas diabloj, estas arianoj¹, estas antikristoj; ili prirabis Cortenuova-n, bruligis Primaluna-n: ili nun ruinigas la vilaĝojn Introbbio, Pasturo, Barsio; ili atingis al Balabbio; morgaŭ ili estos ĉi tie: tiaj estis la onidiroj de buŝ' al buŝo; kaj samtempe jen diskurado, interhaltigo, tumulta interkonsiliĝo, hezitado inter forkuro kaj restado, amasiĝo de virinoj, meto de manoj en la kap-harojn. Don Abbondio, rezoluta forkuri, rezoluta antaŭ ĉiuj kaj pli ol ĉiuj, vidis tamen nevenkeblajn obstaklojn kaj teruregajn danĝerojn en ĉia vojo por iri kaj ĉia loko por rifuĝi. «Kiel fari?» li elkriis: «kien iri?». La montoj, krom la malfaciloj de marŝado, ne estis sekuraj: jam sciigis, ke la landkneĥtoj tien grimpas kiel katoj, kie ajn ili havas apenaŭan indicon aŭ esperon kapti predon. La lago estis perturbita; blovis forta vento: krom tio, plej granda parto de l' boatistoj, timante sin devigotaj transveturigi soldatojn aŭ pakaĵojn, jam rifuĝis al la alia bordo kun siaj boatoj: la kelkaj restintaj forkuris pli poste plenplenaj de homoj; kaj, turmentate per la pezo kaj la ŝtormo, onidire ili riskis ĉiumomente. Por foriĝi de la vojo irota de la armeo, troveblis nek kaleŝeto nek ĉevalo, nek alispeca veturilo: piedmarŝe, Don Abbondio povos trairi ne tro longan vojon, kaj li timis ke oni atakos lin survoje. La Bergama teritorio ne

¹ *arianoj*: herezuloj.

estis tiom distanca, ke liaj kruroj ne povus tien lin porti per unu marŝado; sed estis konate ke el Bergamo estis tute rapide sendita skadro da *cappelletti*-soldatoj², kun la ordono patroli landlime, por fortimigi la landkneĥtojn; kaj ili estis karnaj diabloj, ne malplie ol tiuj ĉi, kaj siaflanke kondukis kiel eble plej fie. La povrulo diskuris tra la hejmo, konsternita kaj duonfreneza; li sekvis Perpetua-n, por kun ŝi kombini solvon; sed Perpetua, okupite por kolekti plejvalorajn objektojn en la hejmo, kaj ilin kaŝi en la subtegmento, aŭ en ĉelaĉoj, trapasis kure, anhele, zorgeme, kun plenaj manoj aŭ brakoj, kaj respondis: «Tuj mi finas forsekurigi ĉi tiujn aĵojn, kaj poste faros ankaŭ ni mem samkiel la aliaj». Don Abbondio volus reteni ŝin, kaj pridiskuti kun ŝi la diversajn solvojn; sed ŝi, inter la farado, kaj la hasto, kaj la teruro, kiu premokupis ankaŭ ŝin mem, kaj la rabio, kiun al ŝi kaŭzis la teruro de l' mastro, estis en tiu cirkonstanco malplej traktebla ol iam ajn. «La aliaj klopodas; ankaŭ ni mem klopodos. Pardonu, sed vi kapablas nur malhelpi. Ĉu vi ne kredas ke ankaŭ la aliaj havas sian vivon por savi? Ĉu la soldatoj venas por militi kontraŭ vin mem? Vi ja povus doni helpon, en ĉi tia cirkonstanco, anstataŭ veni antaŭ miajn piedojn por plori kaj malhelpi». Per ĉi tiuj kaj similaj respondoj ŝi elturniĝis el li; aliflanke ŝi jam decidis ke, fininte laŭpove tiun tumultan operacion, ŝi kaptos lin per unu brako, kiel infanon, kaj treniĉos lin sur monton. Lasita tiel sola, li elŝovis la kapon tra fenestro, rigardis, streĉis la orelojn; kaj vidante onin pasi, li kriis duon-plore kaj duon-riproĉe: «Faru jenan karitaton al via povra parokestro, serĉu por li ĉevalon, mulon, azenon. Ĉu eblas, ke neniu volas min helpi! Ho kiaj homoj! Almenaŭ atendu min, ke ankaŭ mi mem

² *cappelletti*: alban-devenaj dungitaj kavalerianoj.

povu veni kun vi; atendu kiam vi estos dekkvinope aŭ dudekope, por forkonduki min kune, ke mi ne estu forlasita. Ĉu vi volas lasi min enmane de l' hundoj? Ĉu vi ne scias ke ili estas plejparte luteranoj³, ke murdon de pastro ili taksas merit-plena? Ĉu vi volas lasi min ĉi tie suferi martirecon? Ho kiaj homoj! Ho kiaj homoj!». Sed al kiu li diris ĉi-aferojn? Al viroj pasantaj kurbaj sub la pezo de siaj malriĉaj havaĵoj, pensante al tio, kion ili lasis hejme, pelante siajn bovinetojn, kondukante post si la gefilojn, ankaŭ ilin ŝarĝitajn laŭpove, kaj la virinojn, kiuj surportis brake la infanojn ankoraŭ ne kapablajn marŝi. Iuj pluiris, ne respondante, nek suprenrigardante; kelkiu diris: «he respektinda! ankaŭ vi mem faru laŭpove; feliĉas vi, kiu ne devas zorgi pri familio; vi mem helpu vin, vi mem klopodu».

«Ho ve al mi!» elkriis Don Abbondio: «ho kiaj homoj! kiaj koroj! Forestas karitato: ĉiu nur zorgas por si mem; kaj por mi neniu volas zorgi». Kaj denove li serĉis Perpetua-n.

«Ho ĝuste!» ŝi al li diris: «kaj kio pri la mono?».

«Kion ni faru?».

«Donu ĝin al mi, kiu iros subterigi ĉi tie, en la apud-doma legomejo, kune kun la manĝilaro».

«Sed...».

«Sed, sed; donu ĉi tien; vi tenu kelke da moneroj, por eventuala bezono; kaj poste vi lasu min mem disponi».

Don Abbondio obeis, li iris al la monkesto, deprenis sian trezoreton, kaj ĝin liveris al Perpetua; kiu diris: «mi iras subterigi ĝin en la legom-ĝardeno, ĉe l' piedo de l' figarbo»; kaj ŝi iris. Ŝi reaperis post nemulte, kun man-korbo, en kiu estis por-buŝaj provizaĵoj, kaj kun eta, malplena dorso-korbo;

³ *luteranoj*: protestantoj.

kaj ŝi rapidis enmeti en ĝin iom da tolaĵo sia kaj de la mastro, dirante dumtempe: «Almenaŭ la brevieron vi mem kunportos».

«Sed kien ni iru?».

«Kien iras la aliuloj? Antaŭ ĉio, ni iros sur-straten; kaj tie ni aŭdos kaj vidos, kion do konvenas fari».

Tiumomente eniris Agnese kun dors-korbeto, kaj kun mieno de faronto gravan proponon.

Agnese, ankaŭ ŝi mem rezoluta ne atendi tiajn gastojn, estante tiel sola hejme, kaj havante ankoraŭ parton de tiu oro de la nenomito, kelk-tempe hezitis, kien do rifuĝi. Ĝuste la resto de tiuj eskudoj, kiuj dum la malsato-monatoj tiel bele ŝin helpis, estis ĉefkaŭzo de ŝia maltrankvilo kaj hezitado, pro tio ke ŝi aŭdis, ke en la jam invaditaj vilaĝoj, la havantoj monon troviĝis en pli terura situacio, elmetite samtempe al la perforto de l' fremduloj kaj la insidoj de l' vilaĝanoj. Estis ja vere, ke la sekreton pri l' feliĉaĵo sur ŝin pluvinta, se tiel diri, de l' ĉielo, ŝi konfidis al neniu krom Don Abbondio; al kiu ŝi iris por dismonerigi po unu eskudon, ĉiufoje lasante al li ion por donaci al oni pli malriĉa ol ŝi. Sed kaŝita mono, precipe ĉe homo ne kutima man-uzi multe da ĝi, daŭre la posedanton suspektigas pri alies suspekto. Nu, dum laŭpove ŝi kaŝis diversloke tion kion ŝi ne povis kunporti, kaj ŝi pensis pri la eskudoj, kiujn ŝi tenis enkudritaj en la korseto, ŝi rememoris ke, kune kun la mono, la nenomito al ŝi sendis plej malavarajn proponojn de servoj; ŝi rememoris la aferojn kiujn ŝi aŭdis pri lia kastelo, situanta en tiel sekura loko, ke kontraŭ la volo de l' mastro nur birdoj povas ĝin atingi; kaj ŝi decidis iri peti rifuĝon tie supre. Ŝi demandis sin, kiel konatiĝi kun tiu senjoro, kaj tuj ŝi memoris pri Don Abbondio; kiu, post tiu tia

interparolo kun la ĉefepiskopo, ĉiufoje al ŝi komplimentis tre afable, kaj eĉ pli elkore, ĉar li povis tion fari sen kompromitiĝo kun iu ajn, kaj, dum la gefianĉa paro forestis, ankaŭ forestis la eventualo, ke oni farus al li postulon, kiu ege endanĝerigus tiun afablecon. Ŝi supozis ke, en tia konfuzego, la povra viro certe estas pli embarasita kaj konsternita ol ŝi mem, kaj ke tiu solvo povus ŝajni tre bona ankaŭ al li; kaj ŝi venis por al li proponi ĝin. Trovinte lin kun Perpetua, li faris la proponon al ambaŭ.

«Kion vi diras, Perpetua?» demandis Don Abbondio.

«Mi diras ke ĝi estas ĉiela inspiro, kaj oni ne perdu tempon, kaj metu la krurojn survoje».

«Kaj poste...».

«Kaj poste, kaj poste, kiam ni estos tie, ni certe kontentos. Rilate tiun senjoron, estas konate, ke li nuntempe volas nur fari servojn al la proksimulo; kaj ankaŭ li mem estos tute kontenta rifuĝigi nin. Tie, landlime, kaj tiel alte, da soldatoj certe ne venos. Kaj krome, krome, ni tie trovos ankaŭ por manĝi; ĉar sur montoj, elĉepinte tiun ĉi malmulton da Dia graco», kaj tion dirante, ŝi enmetis ĝin en la dors-korbon, supre de la tolaĵoj, «ni troviĝus en aĉa situacio».

«Konvertita, vere konvertita li estas, ĉu?».

«Ĉu eblas ankoraŭ pridubi, post ĉio, kion oni scias; post tio, kion vi mem vidis?».

«Kaj kio, se per tio ni enfermus nin en kaĝon⁴?».

«Kia kaĝo! Per ĉiuj tiaj konsciencaj kazoj, pardonu, oni neniam atingus konkludon. Brave, Agnese! Vi vere havis tre belan elpenon». Kaj stariginte la dors-korbon sur tablon, ŝi enŝovis la brakojn en ties portrimenojn, kaj surdorsigis ĝin.

⁴ *kaĝon*: senelirejon.

«Ĉu ne troveblas kelke da viroj, kiuj venu kun ni, por eskorti sian parokestron? Se ni renkontus kanajlon, da kiuj bedaŭrinde estas pluraj surstrate, kian helpon povus doni vi ambaŭ?».

«Alia eltrovo, por perdi tempon!» elkriis Perpetua. «Ĉu serĉi viron nun-momente, kiam ĉiu havas siajn aferojn por zorgi? Kuraĝe! Vi iru preni la brevieron kaj la ĉapelon; kaj ni ekiru».

Don Abbondio iris, kaj revenis post momento kun la breviero subbrake, kun la ĉapelo surkape, kaj kun sia promenbastono enmane; kaj la tuta triopo eliris tra pordeto kondukanta en la placeton. Perpetua la pordeton refermis kaj ŝlosis, pli por plenumi formalajon, ol fidante je tiu seruro kaj tiuj pordo-klapoj, kaj ŝi enpoŝigis la ŝlosilon. Don Abbondio, pasante, turnis rigardon al la preĝejo, kaj diris inter-dente: «la popolo mem devas ĝin gardi, ĉar por la popolo ĝi estas. Se ili ja havas iom da koro por sia preĝejo, ili zorgos pri ĝi; se male ili estas senkoraj, la samo ilin trafu».

Ili ekiris tra l' kampoj, tute silente, pensante ĉiu pri siaj aferoj, kaj ĉirkaŭ-rigardante, ĉefe Don Abbondio, ĉu aperas suspektinda figuro, io eksterordinara. Oni neniun renkontis: homoj estis aŭ en la domoj, por gardi ilin, por paki, por kaŝi, aŭ sur la stratoj kondukantaj al la montoj.

Suspirinte kaj resuspirinte, kaj poste ellasinte kelke da interjekcioj, Don Abbondio komencis grumbli pli kontinue. Li koleris kontraŭ la duko de Nevers, kiu povus resti en Francujo ĝuante plezurojn, ludante sian princan rolon, kaj male strebis esti ĝi duko de Mantova spite al la tuta mondo; kontraŭ la imperiestro, kiu devus prudenti por aliuloj, lasi la akvon flui laŭnature, kaj ne puntilli pri ĉio: ĉar li restos ĉiuokaze

imperiestro, indiferente ĉu dukos en Mantova unu aŭ alia. Li ĉefe koleris kontraŭ la guberniestro, kies tasko estus fari ĉion eblan, por fortenti de la lando la plagojn, kaj male li mem altiris ilin: ĉio pro la plezuro militi. «Necesus», li diris, «ke tiuj senjoroj ĉeestu ĉi tie, por sperti kia plezuro enestas. Ili havas ja belan konton por doni! Sed dume suferas senkulpuloj».

«Lasu tiajn homojn; ĉar ili mem tute ne venos helpi nin», diris Perpetua. «Ĉi tiaj, pardonu min, estas viaj kutimaj klaĉoj, kiuj nenion solvas. Male, tio kio min ĝenas...».

«Kio estas?».

Perpetua, kiu, dum tiu parto de l' vojaĝo, repensis kviete la kaŝojn hastege faritajn, komencis bedaŭri, ke ŝi forgesis iun aĵon, miskaŝis alian; ke tie ĉi ŝi spuron lasis, kiu povus gvidi tiujn rabistojn; ke tie...

«Brave!» diris Don Abbondio, sentante sin sufiĉe sekura pri la vivo, por maltrankviliĝi pri la havo: «brave! ĉu vi faris tiel ĉi? Kie vi havis la cerbon?».

«Kiel!» elkriis Perpetua, ekhaltante momente, kaj metante la pugnojn sur la flankojn, tiel kiel la dors-korbo tion ebligis: «kiel! ĉu vi venos nun riproĉi min tiele, kiam vi mem konfuzegis mian cerbon, anstataŭ helpi kaj kuraĝigi min! Eble mi zorgis pri la hejmaj aĵoj pli multe ol pri la miaj; mi neniun havis, kiu al mi etendus helpan manon; mi devis roli kiel Marta kaj Magdalena⁵; kaj se io pereos, mi ne scias kion diri: mi faris eĉ pli multe ol mia devo».

Agnese de temp' al tempo interrompis tiujn ĉi konfliktojn, menciante ankaŭ ŝi mem siajn malfeliĉojn: kaj ŝi bedaŭris ne

⁵ *Marta kaj Magdalena*: disĉiplinoj de Jesuo, menciitaj en la Evangelio: tradicie, la unua estas taksata modelo de laboremo, la dua de preĝemo.

tiom pro l' malkomforto kaj damaĝo, kiom pro tio, ke malaperis la espero re-brakumi baldaŭ Lucia-n; ĉar, se vi memoras, ŝi kalkulis ĝuste pri tiu aŭtuno: kaj ne estis supozeble ke Damo Prassede intencas somerumi en tiuj lokoj, en tiaj cirkonstancoj: ŝi eĉ forirus, se ŝi tie ĉeestus, kiel faris ĉiuj ceteraj somerumantoj.

La vido de la lokoj igis eĉ pli vivaj tiujn pensojn de Agnese, kaj pli pika ŝian ĉagrenon. Forlasinte la padojn, ili eniris la publikan vojon, tiun saman tra kiu la povra virino rekondukis la filinon hejmen por tute mallonga tempo, post sia gastado kun ŝi hejme de l' tajloro. Kaj aperis la vilaĝo.

«Ni ja iros saluteti tiujn bonajn homojn», diris Agnese.

«Kaj ankaŭ por iomete ripozi: ĉar pri tiu ĉi dors-korbo mi jam estas sufiĉe laca; kaj krome por manĝi kelke da buŝplenoj», diris Pepetua.

«Kondiĉe ke oni ne perdu tempon; ĉar ni ne vojaĝas por amuzo», konkludis Don Abbondio.

Ili estis akceptitaj kun malfermitaj brakoj, kaj reviditaj kun granda plezuro: tiuj personoj rememoris bonfaron. Vi bonfaru al kiel eble plej multaj, diras ĉi tie nia aŭtoro; kaj des pli ofte vi renkontos vizaĝojn, kiuj kaŭzos al vi ĝojon.

Agnese, brakumante la bonkoran virinon, ellasis ploregon, kiu tre multe ŝin senpezigis; kaj ŝi respondis singultante la demandojn de la virino kaj ŝia edzo pri Lucia.

«Ŝi fartas pli bone ol ni», diris Don Abbondio: «ŝi loĝas en Milano, for de l' danĝeroj, for de ĉi tiaj diablaĵoj».

«Vi eskapas, sinjoro parokestro kaj la kompanio, ĉu?» diris la tajloro.

«Tute jes», respondis unuvoĉe la mastro kaj la servantino.

«Mi kompatas vin».

«Ni estas survoje», diris Don Abbondio, «al la kastelo de ***».

«Viaj moŝtoj elpensis bone: sekuraj kiel en preĝejo».

«Kaj ĉi tie, ĉu oni ne timas?» diris Don Abbondio.

«Mi diros, sinjoro parokestro: ĝuste por kantonmento, kiel vi ja konas la ĝustan terminon, ili ĉi tien ne devus veni: ni estas tro for de ilia vojo, dank' al la Ĉielo. Maksimume iu pasinvado, kiun Dio ne permesu: sed ĉiuokaze oni havas tempon; oni devos antaŭe aliajn sciigojn aŭdi el la malfeliĉaj vilaĝoj, kien ili iros kantonmenti.

Oni akordiĝis, ke oni restos iomete, por refreŝiĝi; kaj, ĉar estis la tagmanĝa horo, «viaj moŝtoj», diris la tajloro: «devas honori mian malriĉan tablon: senceremonie: oni surtabligos teleron da amikeco».

Perpetua diris, ke ŝi kunhavas ion por rompi la faston. Post iom da ambaŭflankaj ceremonioj, oni konsentis kunmeti manĝujojn, kiel oni diras, kaj tagmanĝi komune.

La geknaboj starigis sin tute feste ĉirkaŭ Agnese, ilia iama amikino. Rapide, rapide; la tajloro ordonis al unu knabino (la portinta iom da manĝo al Maria, la vidvino: ĉu vi memoras pri ŝi?), eltiri el pik-ŝeloj kelke da fru-maturaj kaŝtanoj, kiuj estis amasigitaj en anguleto: kaj ilin rosti.

«Kaj ci», li diris al knabo, «iru en la ĝardenon ekskui la persikujon, por faligi kelke da fruktoj, kaj ilin portu ĉi tien: alportu ĉiujn, ja! Kaj ci», li diris al alia infano, «surgrimpu la figujon, por rikolti kelke el plej maturaj figoj. Vi konas eĉ tro multe tian metion». Li mem iris por spili⁶ sian bareleton; la virino por preni iom da tablo-tolaĵo. Perpetua eligis la

⁶ *spili*: malfermi truon por eligi vinon.

proviantojn; oni surtabligis: buŝtukon kaj fajencan⁷ teleron ĉe la honorloko, por Don Abbondio, kun manĝiloj, kiujn Pepetua havis en la dors-korbo. Ili ĉe-tabliĝis kaj tagmanĝis, se ne gajege, almenaŭ multe pli gaje ol kiom ili esperis por tiu tago.

«Kion vi diras, sinjoro parokestro, pri tia ĉi renversego?» diris la tajloro: «ŝajnas al mi, kvazaŭ mi legus la historion de l' Maŭroj en Francujo⁸».

«Kion mi diru? Eĉ tiaĵo devis fali sur min!».

«Tamen viaj moŝtoj elektis bonan rifuĝejon», reparolis la alia: «kiu diable devus grimpi ĝis tie? Kaj tie vi trovos kompanion: ĉar oni aŭdis, ke multe da homoj tien rifuĝis, kaj da ili plu alvenas».

«Mi ja esperas», diris Don Abbondio, «ke ni estas volonte akceptotaj. Mi ja konas tiun valoran senjoron; kiam alifoje mi havis la honoron troviĝi kun li, li estis treege afabla!».

«Kaj al mi», diris Agnese, «li dirigis per la sinjoro monsinjoro eminentega⁹, ke, kiam ajn mi bezonos ion, sufiĉos ke mi iras al li».

«Ja mirinda konvertiĝo!» reparolis Don Abbondio: «kaj ĝi plu daŭras, ĉu ne? ĝi plu daŭras».

La tajloro komencis paroladi pri la sankta vivo de la nenomito, kaj kiel, el plago de l' ĉirkaŭlokoj, li fariĝis ties modelo kaj bonfaranto.

«Kaj kio pri tiaj homoj, kiujn li havis kun si?... tiu tuta servistaro?...» reparolis Don Abbondio, kiu ĉi-koncerne pli ol unufoje jam aŭdis ion, sed neniam estis sufiĉe trankvila.

«Plej grandparte eldomigitaj», respondis la tajloro, «kaj la

⁷ *fajencan*: el fajenco, t.e. bakita kaj glazurita tero.

⁸ *Maŭroj en Francujo*: el la kavalirismaj legaĵoj de la tajloro.

⁹ *sinjoro... eminentega*: t.e. kardinalo Federigo.

restintaj ŝanĝis konduton, ho kiel profunde! Entute, tiu kastelo fariĝis Tebaido¹⁰: vi ja konas ĉi tiajn aferojn».

Poste li komencis paroli kun Agnese pri la vizito de la kardinalo. «Granda viro!» li diris; «granda viro! Domaĝe ke tiel haste kaj rapide li pasis ĉi tie, ke mi eĉ ne povis fari al li iom da honoro. Kiom mi ĝojus, se mi povus al li paroli alifoje, iom pli trankvile!». Kaj kiam ili leviĝis de-table, li al ŝi rimarkigis presajon, kun bildo de la kardinalo, kiun li tenis gluita al pordo-klapo, por respektigo al la eminentulo, kaj ankaŭ por diri al ĉiu ajn, kiu tien trafis, ke la portreto ne similas al li; ĉar li ja povis observi de proksime kaj senurĝe la kardinalon mem, en tiu sama ĉambro.

«Ĉu per tiaĵo oni intencis bildigi lin?» diris Agnese. «La vestaĵo ja similas, sed...».

«Ĝi ne similas, ĉu?» diris la tajloro: «ankaŭ mi mem tion ripetadas: oni ne povas nin trompi, ĉu? sed ĉiuokaze subestas lia nomo: ĝi estas memoraĵo».

Don Abbondio urĝis; la tajloro volis serĉi kaleŝeton, por ilin veturigi ĝis la piedo de la krutaĵo; kaj li tuj eliris por ĝin serĉi, kaj post nemulte revenis, dirante ke ĝi estas alveturonta. Poste li sin turnis al Don Abbondio, kaj al li diris: «sinjoro parokestro, se vi eventuale deziras porti tien supren kelke da libroj, por tempo-pasigo, mi kiel malriĉulo povas vin servi: ĉar ankaŭ mi mem amuziĝas iomete per legado. Ne aferoj laŭ via rango, ne latin-lingvaj; tamen...».

«Dankon, dankon», respondis Don Abbondio: «la cirkonstancoj estas tiaj, ke oni havas apenaŭ cerbon por tio,

¹⁰ *Tebaido*: Egipta dezerto, kie vivis antikvaj kristanaj monakoj (alia erudiciaĵo de la tajloro).

kio estas precepta¹¹».

Dum oni diras dankon kaj nedankinde, dum oni reciprokas salutojn kaj bondezirojn, invitojn kaj promesojn viziteti ĉe l' reveno, la kaleŝeto jam atingis la dom-pordegon. Ili surmetas la dors-korbojn, enkaleŝiĝas kaj komencas, iom pli komforte kaj trankvile, la duan parton de l' vojaĝo.

Koncerne la nenomiton, la tajloro estis dirinta la veron al Don Abbondio. Ek de la tago, kiam ni lasis lin, li seninterrompe daŭrigis fari tion, kion li al si mem promesis: kompensi damaĝojn, peti pacon, helpi malriĉulojn, entute ĉiam bonfari, laŭ oportunoj. La kuraĝon, kiun alitempe li montris, ofendante kaj sin defendante, nuntempe li elmontris, farante nek ofendon nek sindefendon. Li ĉiam iradis sola kaj sen armiloj, dispona al ĉio ajn, kio povus lin trafi, post tiom da faritaj perfortoj, kaj konvinkita ke, apliki forton por defendi sin mem, kiu tiom ŝuldas al tiom multaj, estus denova perforto; ke ĉia malbono al li eventuale farota, estus maljustaĵo fronte al Dio, sed justa puno rilate lin; kaj ke li tute ne rajtas fariĝi punanto de maljustaĵoj. Malgraŭ tio, li restis eksterdanĝera ne malpli ol kiam por sia sekureco li tenis armitaj multe da brakoj kaj la sian. Unuflanke la memoro pri l' iama krueleco, kaj due la konstato pri l' nuna mildeco: la unua, kiu nepre postlasis tiom da venĝo-deziroj, la dua, kiu igis la venĝon tiom facila; ambaŭ aferoj kontribuis por al li havigi kaj gardi admiron, kiu tute efikis por lia protekto. Li estis la homo, kiun neniu iam sukcesis humiligi, kaj kiu humiligis sin mem. La rankoroj, kiujn alifoje akriĝis lia aroganteco kaj alies teruro, nun malaperis fronte al tia nova

¹¹ *precepta*: inter la preceptoj aŭ reguloj de katolikaj pastroj, estas ĉiutaga legado de difinita parto de brevier-preĝoj.

humileco: la ofenditoj ricevis, tute neatendite kaj sendanĝere, la kontentigon, kiun ili ne povis esperi el plej sukcesa venĝo, la kontentigon vidi tian viron pentinta pri siaj maljustaĵoj, kaj partoprena, se tiel diri, en ilia indigno. Multaj, al kiuj multjaran, amaran kaj intensan ĉagrenon kaŭzis tio, ke ili tute ne prognozis, ke ili povos iam ajn fariĝi pli fortikaj ol li, por kompensiĝi je grava maljustaĵo; renkontante nun lin sola, nearmita, kaj kun sinteno de homo ne rezistonta, neniun alian impulson ili sentis krom elmontri al li honoron. Ĉe tia memvola humiliĝo, lia aspekto kaj teniĝo akiris senkonscie ion pli altan kaj noblan; ĉar en tio evidentiĝis, eĉ pli ol antaŭe, lia maltimo de ajna danĝero. La publika respekto por la pentinta kaj bonfara viro kvazaŭe ligis kaj devigis al respekto eĉ la plej krudajn kaj rabiajn malamikojn. Kaj ĉi-respekto estis tia, ke ofte li trovis sin embarasita por ŝirmi sin kontraŭ omaĝoj al li farataj, kaj devis ne montri tro multe en la mieno kaj gestoj sian internan pento-senton, nek tro multe mallevis sin, por ne tro multe esti levata. En la preĝejo li elektis por si la lastan lokon; kaj tute ne estis risiko, ke iu alia okupus ĝin: estus kvazaŭ uzurpi honor-lokon. Kaj ofendi tian viron, aŭ trakti lin ne tute respektate, povus aspekti sakrilegie, pli ol impertinente kaj malbrave: kaj eĉ tiuj, kiujn nur alies respekto detenis, ili mem pli-malpli partoprenis en tiu sento.

Tiuj ĉi samaj kaŭzoj, krom aliaj, fortenis ankaŭ la venĝojn de la publika justico, kaj al li havigis eĉ tiuflanke la sekurecon, pri kiu li tute ne zorgis. Liaj rango kaj parenco, kiuj ĉiutempe rolis por lia defendo, des pli favoris lin nuntempe, kiam al tiu nomo, jam eminenta kaj fi-fama, aldoniĝis la laŭdo de modela konduto, kaj la gloro de konvertiĝo. Pri ĝi la juĝistaro kaj la altranguloj publike

gratulis same kiel la popolo: kaj aspektus tre strange krueli kontraŭ la objekto de tiom da gratuloj. Krom tio, la publika potenco, okupite ĉe ĉiamdaŭra kaj ofte malfeliĉa milito kontraŭ vivaj kaj revivantaj ribeloj, rajtis tute kontenti, ke ĝi liberiĝis el la plej nebridebla kaj ĝena ribelo, sufiĉe por ne strebi alion: des pli ke tiu konvertiĝo estigis riparojn, kiujn la potenco kutimis nek ricevi, nek postuli. Turmenti sanktulon, ne ŝajnis bona rimedo, por forviŝi la honton, ke oni ne sukcesis aldevigi krimulon: kaj la ekzemplo, kiun oni donus, punante lin, nenian efikon estigus, krom deturni liajn similulojn el eventuala intenco fariĝi neofendaj. Verŝajne ankaŭ la rolo de kardinalo Federigo en tiu konverto, kaj lia nomo kunigita kun tiu de la konvertito, fariĝis por ĉi-lasta kvazaŭ sankta ŝildo. Kaj en tia stato de aferoj kaj ideoj, en tiaj specialaj rilatoj inter la spirita aŭtoritato kaj la civila potenco, tiel ofte interkonfliktaj, neniam celante reciprokan detruon, kaj eĉ ĉiam miksante kun konfliktoj rekonon kaj grandajn omaĝojn, kaj kiuj ofte eĉ kunlaboris al komuna celo, sed neniam farante pac-kontrakton, ŝajnis iamaniere ke la paciĝo de la spirita aŭtoritato kunportas la amnestion se ne la absolvon flanke de la civila potenco, konsidere ke nur la spirita estigis rezulton sopiratan de ambaŭ.

Tiel tiun viron, sur kiun, se li falus, grandaj kaj etaj uloj konkure alrapidus, por lin pied-premi; ĉar li mem volonte sin sternis teren, ĉiuj indulgis, kaj multaj al li sin klinis.

Ja veras ke multis ankaŭ tiuj, kiuj tute ne ŝatis tiun bruan ŝanĝiĝon: tiom da salajrataj krim-plenumistoj, tiom da kunkrimuloj, kiuj perdis tiel grandan forton, je kiu ili kutimis konfidi, kiuj eĉ trovis tranĉitaj fadenojn de intrigoj jam delonge aranĝitaj, eble ĝuste kiam ili atendis avizon pri ties

plenumo. Sed ni jam vidis, kiajn diversajn sentojn tiu konvertiĝo estigis en la sbiraĉoj, kiuj tiam troviĝis kun li, kaj kiuj aŭdis ĝin anoncata el lia buŝo mem: mirego, ĉagreno, deprimiĝo, kolero; iom el ĉio, escepte de malestimo kaj malamo. La samo okazis ĉe la aliaj, kiujn li tenis en diversaj lokoj, la samo ĉe pli alt-rangaj komplikoj, kiam ili ricevis la teruran novaĵon, kaj ĉiufoje pro la samaj motivoj. Pli da malamo, kiel mi trovas en la teksto aliloke citita de Ripamonti, trafis kardinalon Federigo. Oni lin rigardis kvazaŭ enmiksiĝinton en iliajn aferojn, por ilin fuŝi; la nenomito intencis siaflanke savi sian animon: neniu havis kialon por tion kritiki.

Poste, iom post iom, plej granda parto de liaj hejmaj sbiraĉoj, ne povante adaptiĝi al la nova disciplino, nek vidante probabla ties ŝanĝiĝon, foriris. Eble iu serĉis alian mastron, eĉ inter la iamaj amikoj de la forlasita mastro; eble alia varbiĝis en armeo de Hispanujo aŭ Mantova, aŭ de alia militanta partio; alia sin starigis surstraten, por private militi per si mem; eble alia kontentiĝis vagadi friponante tute libere. Kaj ion similan verŝajne faris la estintaj sub liaj ordonoj en diversaj lokoj. El tiuj, kiuj adaptiĝis al la nova vivo-maniero, aŭ eĉ volonte ĝin akceptis, plej granda parto, naskite en tiu valo, revenis al la kampoj, aŭ al la metioj lernitaj en junaĝo, kaj forlasitaj pli poste; la fremduloj restis en la kastelo, kiel servistoj: ambaŭ grupoj, kvazaŭ ricevinte denovan benon kune kun sia mastro, vivis, same kiel li, nek farante nek ricevante maljustaĵojn, senarmaj kaj respektataj.

Sed kiam, ĉe l' invado de la germanaj bandoj, iuj fuĝantoj el vilaĝoj invaditaj aŭ minacataj, suprenvenis al la kastelo, petante rifuĝon, la nenomito, tute kontenta, ke liajn fortikaĵojn

serĉas kiel azilon la senfortuloj, kiuj tiom longe ilin rigardis de malproksime kiel grandan terurilon, li akceptis tiujn erarvagantojn, kun elmontroj de dankemo pli ol de afableco; li disvastigis la sciigon ke lia domo estos malfermita al ĉiu ajn, kiu volus tien rifuĝi, kaj li tuj disponigis defendon ne nur de la domo, sed ankaŭ de la valo, se eventuale landkneĥtoj aŭ *cappelletti*-soldatoj provus tien veni por fari iun el siaj fi-entreprenoj. Li kolektis la ĉe li restintojn, nemultajn kaj valorajn, kiel la versoj de Torti¹²; li faris al ili paroladon pri la oportuno, kiun Dio al ili kaj al li havigas, strebi helpi al la proksimulo, de ili tiomfoje subpremita kaj terorita; kaj, kun la senekscita voĉ-tono, kiu esprimas certecon pri oboe, li anoncis al ili, kion ĝenerale li intencas, ke ili faru, kaj ĉefe li preskribis, kiel konduki, por ke la tien rifuĝintoj rigardu ilin nur amikoj kaj defendantoj. Poste li desuprigis de subtegmenta ĉambro la pafajn, tranĉajn kaj stangajn armilojn, kiuj jam delonge tie kuŝis amasigite, kaj li disdonis ilin; li anoncigis al liaj kampuloj kaj farmistoj en la valo, ke kiu ajn sentas sin kuraĝa, tiu venu kun armiloj al la kastelo; al ne havantoj li donis da ili, li elektis iujn roli kiel oficiroj, kaj havi aliajn sub sia komando; li atribuis la postenojn ĉe la enirejoj, kaj en aliaj lokoj de la valo, sur la krutaĵo, kaj ĉe l' pordegoj de l' kastelo; li fiksis la horojn kaj manierojn por deĵor-ŝanĝo, kiel en kampanjo, aŭ kiel iam estis kutime en tiu sama kastelo, en la tempoj de lia malespera vivo.

En angulo de tiu subtegmenta ĉambro kuŝis aparte la armiloj, kiujn iam nur li mem surportis; lia fama karabeno, muskedoj, glavoj, glavegoj, pistoloj, tranĉilaĉoj, ponardoj,

¹² *Torti*: amikeca aludo al Giovanni Torti, itala poeto (1774-1852), kies verkojn Manzoni taksis valoraj.

surgrunde, aŭ apogite al la muro. Neniu el la servistoj tuŝis ilin; sed ili akordiĝis demandi la mastron, kiujn el ili al li porti. «Neniun», li respondis; kaj, ĉu temis pri voto, aŭ pri alispeca decido, li ĉiam restis nearmita, komande de tiu speco de garnizono.

Samtempe li jam aktivigis aliajn virojn kaj virinojn, servantajn aŭ dungitajn, por pretigi en la kastelo gastigon por kiel eble plej multe da homoj, starigi litojn, dismeti pajlo-matracojn kaj peplomojn¹³ en la ĉambroj, en la salonoj, kiuj fariĝis komunaj dormejoj. Kaj li ordonis venigi abundajn proviantojn, por vivteni la gastojn, kiujn Dio alsendos, kaj kiuj fakte plimultiĝis tagon post tago. Intertempe li neniam restis senaktiva; en kaj ekster la kastelo, suben kaj reen tra la krutaĵo, zigzage tra la valo, por disponi, por fortikigi, por viziti postenojn, por vidi, por vidiĝi, por ordigi kaj gardi en ordo, per vortoj, per okuloj, per sia ĉeesto. Hejme kaj surstrate, li akceptis la alvenantojn; kaj ĉiuj, ĉu jam vidinte lin, aŭ lin vidante unuafoje, rigardis lin ravite, forgesante momente la malfeliĉojn kaj timojn, kiuj pelis ilin tien; kaj ili sin turnis por rerigardi lin, kiam, disiginte de ili, li pluiris sian vojon.

¹³ *peplomoj*: vate aŭ plume remburitaj litkovriloj

Malgraŭ tio, ke la hom-amasiĝo estis pli densa ĉe l' ekstremaĵo kontraŭa al tiu, tra kiu niaj tri fuĝantoj proksimiĝis al la valo, ili tamen komencis trovi kunvojaĝantojn kaj samsortanojn alvenintajn aŭ alvenantajn el flankaj vojetoj kaj padoj. En tiaj cirkonstancoj, ĉiuj renkontiĝantoj kondukas kvazaŭ ĉiuj konus sin reciproke. Ĉiufoje kiam la kaleŝeto atingis pied-marŝanton, oni interŝanĝis demandojn kaj respondojn. Kelkaj forkuris, kiel la niaj, ne atendante la alvenon de l' soldatoj; aliaj jam aŭdis tamburojn aŭ trumpetojn; triaj jam ilin vidis, kaj bildigis ilin kiel teruritaj homoj kutimas bildigi.

«Ni estas ja bonŝancaj», diris la du virinoj: «ni danku la Ĉielon. Pereu havaĵoj; sed almenaŭ ni mem estas savitaj».

Sed Don Abbondio trovis nenion ĝojinda; eĉ tiu amasiĝo, kaj la alia pli densa, kiun li aŭdis formiĝi je l' alia ekstremo, komencis kaŭzi al li ĝenon. «Ho, kia historio!» li grumblis al la virinoj, en momentoj, kiam neniŭ ĉeestis ĉirkaŭe: «ho kia historio! Ĉu vi ne komprenas, ke multnombra amasiĝo de homoj en unu lokon signifas altiri la soldatojn perforte? Ĉiuj kaŝas, ĉiuj forportas; en la domoj restas nenio; ili supozos, ke tie supre kuŝas trezoroj. Tute certe ili venos. Ili venos tutcerte. Ho ve al mi! Kien do mi implikiĝis!».

«Ho! Ili celas tute alion, ol veni tien supren», diris Perpetua: «Ankaŭ ili mem devas pluiri sian vojon. Krom tio, mi ĉiam aŭdis, ke en danĝeroj preferindas kunesti multope».

«Ĉu multope? ĉu multope?» replikis Don Abbondio: «Kompatinda virino! Ĉu vi ne scias ke ĉiu landkneĥto manĝegas centope da ĉi tiuj? Kaj krome, se ili volus fari frenezaĵojn, estus ja ĝojinde, ĉu ne, troviĝi en batalo. Ho ve al

mi! Malpli aĉe estus, se ni estus grimpintaj sur montojn. Kial do ĉiuj sin ŝovas en unu lokon!... Ĝenuloj», li grumblis poste pli mallaŭte: «ĉiuj ĉi tien: kaj ek, kaj ek, kaj ek; unu post alia, kiel sencerbaj ŝafoj».

«Tiamaniere», diris Agnese, «ili povus diri la samon pri vi».

«Kvietiĝu do», diris Don Abbondio, «ĉar klaĉoj tute ne utilas. Kio estas farita, tio estas farita: ĉi tie ni estas, kaj ĉi tie ni devas resti. Okazos tio, kion volos la Providenco: la Ĉielo al ni sendu bonan ŝancon».

Sed la afero pli aĉiĝis kiam, ĉe l' eniro en la valon, li vidis fortikan postenon de armitoj, parte ĉe la dom-pordego, kaj parte en la teretaĝaj ĉambroj: ĝi aspektis kiel kazerno¹. Li kaŝrigardis ilin: ne temis pri la samaj vizaĝoj, kiujn li devis vidi dum sia unua dolora vojaĝo, aŭ, se samaj, ili estis nun tute ŝanĝitaj; sed malgraŭ tio, ne direblas kian ĉagrenon al li kaŭzis tia vidaĵo. – Ho ve al mi! – li pensis: – vidu, ĉu frenezajojn oni faras. Aliflanke ne povis okazi ali-maniere: ĝuste tiaĵon mi estus devinta atendi el viro tiuspeca. Sed kion li intencas fari? Ĉu li volas militi? Ĉu li mem volas reĝi? Ho ve al mi. En cirkonstancoj, kiam, se pove, oni volus sin kaŝi subtere, li male serĉas ĉian manieron por rimarkiĝi, por atentigi; ŝajnas, ke li volas ilin inviti! –

«Nun vi vidas, sinjoro mastro», al li diris Perpetua, «ĉu estas ĉi tie bravaj homoj, kiuj kapablos nin defendi. Ja venu la soldatoj: ĉi tie oni ne estas kiel tiuj niaj teruritoj, nur kapablaj funkciigi krurojn».

«Silentu!» respondis Don Abbondio kun voĉo mallaŭta, sed koler-plena: «silentu! ĉar vi ne scias, kion vi diras. Vi

¹ *kazerno*: konstanta loĝejo de soldataro.

preĝu la Ĉielon, ke la soldatoj urĝiĝu, aŭ ne sciiĝu, kio okazas ĉi tie, ke oni aranĝas ĉi tiun lokon kvazaŭ fortikaĵon. Ĉu vi ne scias, ke la soldatoj... kapti fortikaĵojn estas ilia metio? Nenion alian ili serĉas; por ili, fari sturmon estas kiel iri al nupto-festo; ĉiu havaĵo, kiun ili trovas, fariĝas ilia proprieto, kaj la homojn ili tra-glavas. Ho ve al mi! Sufiĉe, mi vidos, ĉu troviĝos la maniero elsaviĝi sur tiuj krutegaĵoj. En batalo ili ne min trafos, ho! en batalo ili ne min trafos».

«Sed se vi timas eĉ ricevi defendon kaj helpon...» reparolis Perpetua; sed Don Abbondio interrompis ŝin krude, tamen plu mallaŭte: «silentu! Kaj gardegu vin, tute ne raportu tiujn ĉi parolojn. Memoru, ke ĉi tie oni devas daŭre afiŝi ridantan vizaĝon, kaj aprobi ĉion, kion oni vidas».

Ĉe la Misnokto-drinkejo, ili trovis alian etan taĉmenton da armitoj, antaŭ kiuj Don Abbondio faris senĉapeliĝon, dirante dume en si mem: – Ho ve, ho ve: mi trafis ĝuste en armean tendumejon! –. Ĉi tie la kaleŝeto ekhaltis; ili eliris de ĝi; Don Abbondio rapide pagis kaj forsalutis la koĉeron; kaj li ekmarŝis kun la du kunulinoj laŭ la krutaĵo, senparole. La vido de tiuj lokoj revekis en lia fantazio la memoron pri la angoroj tie suferitaj alifoje, kaj miksis ilin kun la nunaj. Kaj Agnese, kiu tiujn lokojn neniam estis vidinta, kaj pri ili estis en sia menso komponinta fantazian bildon, kiun ŝi rememoris ĉiufoje kiam ŝi repensis la teruran vojaĝon de Lucia, nun, vidante ilin, kiaj efektive ili estas, travivis kvazaŭ novan kaj pli vivan senton pri tiuj kruelaj memoroj. «Ho, sinjoro parokestro!» ŝi elkriis: «se pensi ke mia povra Lucia pasis tra tiu ĉi vojo!».

«Ĉu vi ne volas silenti? senprudenta virino!» al ŝi kriis ĉe-orele Don Abbondio: «ĉu tiajn parolojn oni faru ĉi tie? Ĉu vi ne scias, ke ni estas en lia hejmo? Bonŝance, ke nun neniu

aŭdas vin; sed, se vi parolas ĉi-maniere...».

«Ho!» diris Agnese: «nun li estas sanktulo...!».

«Vi silentu», al ŝi replikis Don Abbondio: «ĉu vi kredas ke al sanktuloj oni rajtas diri senrespekte ĉion ajn, kio venas en la kapon? Prefere vi zorgu danki lin pro lia bonfaro».

«Ho! pri tio mi jam pensis: ĉu vi kredas, ke mi ne konas iom da bontono?».

«Bontono estas ne diri aferojn, kiuj povas malplaĉi, precipe al homoj ne kutimaj ilin aŭdi. Kaj bone komprenu vi ambaŭ, ke ĉi tie ne estas loko por klaĉadi, kaj diri ĉian aferon, kiu trafas en vian menson. Ĝi estas domo de granda senjoro, tion vi jam scias: vi vidas kia kunularo ĉirkaŭas: ĉi tien venas ĉiuspecaj homoj; tial: prudentu, laŭpove: pripensi la dirotajn vortojn, kaj ĉefe diri malmulte da ili, kaj nur se necese: ĉar per silento oni neniam eraras».

«Pli aĉe kondutas vi mem per ĉiuj ĉi viaj...» reparolis Perpetua.

Sed: «silentu!» kriis mallaŭte Don Abbondio, kaj samtempe li senĉapeligis sin rapide, kaj faris profundan sinklinon: ĉar levante la rigardon, li estis vidinta desupri ilia-direkte la nenomiton. Ankaŭ ĉi-lastaj jam vidis kaj rekonis Don Abbondion; kaj pli rapidiĝis por veni al li renkonte.

«Sinjoro parokestro», li diris, kiam li estis al li proksima, «mi volus al vi disponigi mian hejmon en pli feliĉa okazo; sed ĉiumaniere mi tute kontentas esti al vi utila iamaniere».

«Fidante la grandan bonkorecon de via eminentega moŝto», respondis Don Abbondio, «mi aŭdacis veni, en ĉi tiuj ĉagrenaj cirkonstancoj, ĝeni vin; kaj, kiel via eminentega moŝto vidas, mi eĉ al mi permesis konduki kunulojn. Ĉi tiu estas mia mastrumantino...».

«Bonvenon», diris la nenomito.

«Kaj tiu ĉi», daŭrigis Don Abbondio, «estas virino, al kiu via senjora moŝto jam bonfaris: la patrino de tiu... de tiu...».

«De Lucia», diris Agnese.

«De Lucia!» elkriis la nenomito, sin turnante kun mallevita kapo al Agnese. «Ĉu mi bonfaris! Eterna Dio! Ja vi bonfaras al mi, venante ĉi tien... ĉe min... en ĉi tiun domon. Vi estu bonvena. Vi al ni portas benon».

«Ho ne!» diris Agnese: «Mi venas ĝeni vin. Mi eĉ», ŝi daŭrigis, sin proksimigante al lia orelo, «mi devas eĉ danki vin...».

La nenomito ĉesigis tiajn vortojn, demandante tute zorge sciigojn pri Lucia; kaj ricevinte ilin, li sin turnis por akompani al la kastelo la novajn gastojn, kiel fakte li faris, malgraŭ ilia ceremonia rezisto. Agnese turnis al la parokestro okulumon, kiu signifis: vidu do, ĉu estas bezone ke vi enmiksiĝu inter nia duopo, por konsili.

«Ĉu ili atingis vian parokon?» demandis lin la nenomito.

«Ne, senjoro, ĉar tiujn diablojn mi ne volis atendi», respondis Don Abbondio. «Nur la Ĉielo scias, ĉu mi povus elsaviĝi el iliaj manoj, kaj veni ĝeni vian eminentegan moŝton».

«Bone, vi kuraĝu», reparolis la nenomito: «ĉar nun vi estas en sekura loko. Ĉi-supren ili ne venos; kaj se ili volus tion provi, ni ja pretas akcepti ilin».

«Espereble ili ne venos», diris Don Abbondio. «Kaj mi aŭdas», li aldonis, montrante per la fingro la montojn fermantajn la kontraŭan flankon de valo, «mi aŭdas, ke ankaŭ tiuflanke vagas alia bandaĉo², ba... ba...».

² *alia bandaĉo*: veneciaj armeanoj ĉe la landlimo.

«Ja veras», respondis la nenomito: «sed vi ne dubu, ke ni pretas ankaŭ rilate tiujn».

– Inter du fajroj, – diris al si mem Don Abbondio: – ĝuste inter du fajroj. Kien do mi lasis treni min! kaj fare de du klaĉulinoj! Koncerne lin, ŝajnas ke tion li ĝojĝuas! Ho kiaj homoj vivas en la mondo! –

Kiam ili eniris la kastelon, la senjoro kondukigis Agnese-n kaj Perpetua-n en ĉambron de la porvirina loĝejo, kiu okupis tri flankojn de la dua korto, en la malantaŭa parto de la konstruaĵo sur elstara kaj izolita roko, impona super abisma krutaĵo. La viroj loĝis en la flankoj de la alia korto dekstre kaj male, kaj en tiu kiu samnivelis je la esplanado. La mezan parton, kiu disigis la du kortojn, kaj ebligis transpason de unu al la alia, tra vasta vestiblo³ fronte al la ĉefpordo, parte okupis la proviantoj, kaj parte estis destinita kiel deponejo de la havaĵoj kiujn la rifuĝintoj eventuale intencis sav-ŝirmi tie supre. En la porviraj loĝejoj, estis kelke da ĉambroj destinitaj por eventualaj ekleziuloj. La nenomito mem akompanis tien Don Abbondion, kiu tie ekloĝis kiel unua.

Dudek tri aŭ dudek kvar tagojn restis niaj rifuĝintoj en la kastelo, meze de senĉesa movado, en granda kompanio, kiu en la unua tempo pli kaj pli kreskis; sed nenio eksterordinara okazis. Preskaŭ neniu tago forpasis sen alarmo. Venas landkneĥtoj de tie; oni vidis *cappelletti*-soldatojn aliflanke. Ĉe ĉiu averto, la nenomito sendis esplorantojn; kaj se bezone li kunprenis virojn, kiujn li tenis daŭre pretaj ĉi-cele, kaj kun ili li iris ekster la valon, direkte tien, kie estis indikita la danĝero. Kaj estis kurioze, vidi taĉmenton da viroj tute armitaj, kaj ordigitaj kvazaŭ trupe, gvidataj de ne-armito. Plejofte temis

³ *vestiblo*: enira parto, tra kiu oni atingas la ĉambrojn.

nur pri furaĝantoj⁴ kaj disvagaj rabistoj, kiuj forkuris antaŭ ol oni ilin atingus. Sed iun fojon, dum li forpelis kelke da ili, por ilin konvinki ne plu veni en tiujn lokojn, la nenomito ricevis avizon, ke najbaran vilaĝeton oni invadis kaj prirabas. Temis pri landkneĥtoj el diversaj korpusoj, kiuj post-restinte por rabi, kolektiĝis kaj iradis fari subitajn sturmojn en la lokojn proksimajn al tiuj, kie loĝis la armeo; ili prirabis la loĝantojn kaj faris al ili ĉiuspecajn kanajlaĵojn. La nenomito faris mallongan parolon al siaj viroj, kaj kondukis ilin al la vilaĝeto.

Ili alvenis neatendite. La kanajloj, kredintaj ke ili predos senprobleme, vidante alveni virojn trupe ordigitajn kaj pretajn batali, interrompis la predadon kaj forrapidis tien, de kie ili estis venintaj, ne atendante unu la alian. La nenomito persekutis ilin iom longe; poste, haltiginte la taĉmenton, li restis iom da tempo atende, ĉu li vidas novaĵon; kaj fine li returniĝis. Kaj repasante tra la savita vilaĝo, ne direblas kiaj aplaŭdoj kaj benoj akompanis la liberigan taĉmenton, kaj ties kondotieron.

En la kastelo, en tiu hazarda kolekto el homoj diversaj laŭ vivkondiĉoj, moroj, sekso kaj aĝo, neniam estiĝis iel grava malordo. La nenomito disponigis divers-loke gardantojn, kiuj vigladis, ke estiĝu neniu malkonvenaĵo, kun tiu zorgemo, kiun ĉiu aplikis en la aferoj, pri kiuj oni devos al li doni konton.

Li krome petis, ke ankaŭ la ekleziuloj kaj la plej prestiĝaj homoj inter la rifuĝintoj ĉirkaŭiru kaj viglu. Kaj laŭeble plej ofte li mem ĉirkaŭiris, kaj sin montris ĉiuloke; sed, eĉ kiam li ne ĉeestis, memori en kies hejmo oni gastas, estis bremsa por la homo, kiu eventuale tion bezonus. Kaj cetere temis pri rifuĝintoj, kaj do homoj ĝenerale inklinaj al kvieto: la zorgoj

⁴ *furaĝantoj*: kolektantoj herbaĵojn, por nutri la armeajn ĉevalojn.

pri la hejmo kaj la havaĵoj, foje ankaŭ pri parencoj aŭ amikoj restintaj en danĝero, la novaĵoj venantaj de ekstere, deprimante la animojn, gardis kaj pliigis tian sintenon.

Ĉeestis tamen ankaŭ da ventkapuloj, viroj pli firme harditaj kaj kun pli freŝa kuraĝo, kiuj strebis travivi tiujn tagojn plej gaje. Ili forlasis siajn hejmojn, pro tio ke ili ne estis sufiĉe fortaj, por ilin defendi; sed ili trovis ne kontentige ĝemi kaj suspiri pri afero senrimeda, imagi aŭ fantaziumi pri la fuŝoj, kiujn ili bedaŭrinde vidos propraokule. Amikaj familioj estis vojaĝintaj komune, aŭ hazarde renkontiĝis tie; novaj amikecoj estiĝis; kaj la homamaso dividiĝis en grupojn, laŭ la diversaj humoroj kaj moroj. Havantoj monon kaj diskretecon⁵, desupris tagmanĝi en la valo, kie ĉeokaze estis haste starigitaj drinkejoj: ĉe unuj la buŝplenoj alternis kun suspiroj, kaj pri nenio licis paroli krom pri malfeliĉoj; ĉe aliaj la malfeliĉojn oni ne menciis, krom por diri, ke oni ne pripensu ilin. Al ne povantaj aŭ ne volantaj manĝi propra-elspeze, oni en la kastelo disdonis panon, supon kaj vinon: kaj aldone kelke da manĝotabloj estis ĉiutage pretigitaj por la invititoj de la mastro mem; kaj nia triopo apartenis al ĉi-lastaj.

Agnese kaj Perpetua, por ne manĝi parazite, volis kunlabori en la servoj, kiujn tiel granda gastigado postulis; kaj per tio ili pasigis grandan tago-parton; la reston per babiloj kun akiritaj amikinoj, aŭ kun la povra Don Abbondio. Ĉi lasta havis nenion por fari, tamen li tute ne enuis, ĉar la timo estis lia kompano. La timo pri efektiva atako forpasis, mi opinias, aŭ se iom da ĝi restis, malpleje ĝi lin ĝenis; ĉar, se apenaŭ pripensi, li nepre komprenis, kiom tia timo estas senbaza. Sed la bildo de la ĉirkaŭa teritorio ambaŭflanke inundita de

⁵ *diskretecon*: por ne elprofiti la gastamecon pli ol bezone.

soldataĉoj, la armiloj kaj armitoj, kiujn li daŭre ĉirkaŭvidis, la kastelo, ĝuste tiu kastelo, la penso pri multe da aferoj, kiuj povus estiĝi ĉiamomente en tiaj cirkonstancoj, ĉio gardis en li konfuzan, ĝeneralan kaj daŭran teruron; se ne menciis la ronĝon, kiun al li kaŭzis la penso pri lia povra hejmo. Dum la tuta tempo de lia restado en tiu rifuĝejo, li neniam malproksimiĝis de ĝi ĝis unu paf-distanco, nek iam ajn li metis piedon sur la descenda vojo: lia ununura promeno estis eliro sur la esplanadon, kaj iro jen al unu jen al la alia flanko de la kastelo, por rigardi malsupren al krutoj kaj abismoj, por esplori, ĉu estas pasejo iom irebla, iom da pado, tra kie serĉi kaŝejon se okazus interbatiĝo. Al ĉiuj kun-rifuĝintoj li faris grandajn riverencojn aŭ grandajn salutojn, sed li frekventis tre malmulte da ili: lia plej ofta konversacio okazis kun la du virinoj, kiel ni diris; li iris ellasi al ili siajn sentojn, kun risko, ke Perpetua lin riproĉegis, kaj eĉ Agnese lin hontigis. Ĉetable, kie li sidis mallonge kaj parolis tute malmulte, li aŭdis pri la terura pasado la novaĵojn ĉiutage venantajn aŭ de vilaĝo al vilaĝo, aŭ de buŝo al buŝo, aŭ tien raportitaj de iuj kiuj volis resti hejme, sed lastmomente forkuris, nenion savinte, kaj eventuale eĉ batite: kaj ĉiutage estis nova rakonto pri okazinta malfeliĉo. Iuj, profesie novelistoj⁶, kolektis diligente ĉiujn onidirojn, kribris⁷ ĉiujn raportojn, kaj poste disdonis ties kremon al aliaj. Oni diskutis, kiuj do estas la plej diablaj regimentoj, ĉu pli fias la infanterio aŭ la kavalerio; oni rediris laŭpove certajn nomojn de kondotieroj; pri kelkaj oni rakontis la pasintajn heroaĵojn, oni detalis la haltojn kaj marŝadojn: en

⁶ *novelistoj*: aŭtoroj de noveloj, t.e. beletraj rakontoj.

⁷ *kribris*: ekzamenis, por eltiri nur tion, kio estis pli verŝajna aŭ pli interesa.

tiu tago, tiu regimento disiris tra tiuj vilaĝoj, morgaŭ ĝi sturmos tiujn aliajn, kie intertempe tiu alia regimento kondutas diable kaj eĉ pli aĉe. Oni ĉefe klopodis informiĝi, kaj oni kalkulis la regimentojn, laŭvice transirantajn la ponton de Lecco, ĉar tiujn oni povis taksi foraj, kaj vere ekster la lando. Transiras la kavalerio de Wallenstein, transiras la infanterio de Merode, transiras la kavalerio de Anhalt, transiras la infanterio de Brandeburgo, poste la kavalerio de Montecuccoli, pli poste tiu de Ferrari; transiras Altringer, transiras Furstenberg, transiras Colloredo; transiras la Kroatoj, transiras Torquato Conti, transiras aliaj kaj aliaj; kiam plaĉis al la Ĉielo, transiris ankaŭ Galasso, kiu estis la lasta. Ankaŭ la kavaleria skadro de l' Venecianoj fine foriris; kaj la tuta lando dekstre kaj male troviĝis libera. La loĝantoj de l' pli frue invaditaj kaj liberigitaj teritorioj jam forlasis la kastelon; kaj ĉiutage da aliaj foriris; kiel, post aŭtuna ŝtormo, vidiĝas el la densfoliaj branĉoj de granda arbo forflugi ĉiufanke birdoj tien rifuĝintaj. Mi kredas ke nia triopo foriris kiel lasta; kaj tio laŭ volo de Don Abbondio, kiu timis ke, se frue reveni hejmen, oni povas ie trovi landkneĥtojn dis-restintajn ariergarde. Perpetua ja insistis, ke ju pli oni prokrastas, des pli oni ebligas la vilaĝajn friponojn eniri la hejmon kaj forŝteli la restaĵon; kiam temis pri vivo-savo, ĉiam venkis Don Abbondio, se urĝa danĝero tute ne malfunkciigis lian cerbon.

En la tago fiksita por foriri, la nenomito al ili havigis ĉe la Misnokto pretan kaleŝon, en kiun li jam metigis tol-kompleton por Agnese. Kaj apartiginte ŝin, li al ŝi akceptigis ankaŭ paketon da eskudoj, por rebonigi la fuŝojn, kiujn ŝi trovas hejme; malgraŭ tio ke ŝi, batante per mano sian bruston, diradis, ke tie ŝi ankoraŭ havas el la unuaj.

«Kiam vi vidos vian bonvirtan, povran Lucia-n...», li fine al ŝi diris: «mi jam certas ke ŝi preĝas por mi, ĉar mi tiom multe al ŝi malbonfaris: diru do al ŝi, ke mi ŝin dankas, kaj mi fidas je Dio, ke ŝia preĝado efikos ankaŭ kiel beno por ŝi mem».

Li poste bonvolis akompani la tri gastojn ĝis la kaleŝo. La humilajn kaj profundegajn dankesprimojn de Don Abbondio kaj la komplimentojn de Perpetua, imagu la leganto mem. Ili ekveturis; ili faris laŭplane pas-viziton, eĉ ne sidiĝante, en la hejmo de la tajloro, kie ili aŭdis rakonti cent aferojn pri l' arma trapaso; la kutiman historion pri raboj, batoj, malŝparoj, fiaĵoj; sed tie, bonŝance, tute ne vidiĝis landkneĥtoj.

«Ha sinjoro parokestro!» diris la tajloro, per brako helpante lian enkaleŝiĝon: «neprus komponi presitajn librojn, super ĉi tia frakaso».

Post iom plua vojo, niaj vojaĝantoj komencis vidi proprakule iom el la multo, kion ili jam aŭdis priskribi: vitejoj nudigitaj, ne pro rikolto, sed kvazaŭ trafite de samtempaj hajlo kaj ŝtormo: sarmientoj⁸ alterigitaj, senfoliigitaj kaj taŭzitaĵoj; estis malfiksitaĵoj la palisoj, tretita la grundo, kaj dissemitaĵoj splitoj, folioj, sekaj branĉetoj; disrompitaĵoj, stumpigitaj la arboj; truigitaj la heĝoj; forigitaj la krado-pordoj. Kaj en la vilaĝoj, frakasitaĵoj pordoj, disrompitaĵoj fenestro-ŝirmiloj, pajlo, ĉifonoj, ĉiuspecaĵoj rompaĵoj, amasigitaj aŭ disaj surstrate; peza aero, pli fortaj haladzoj el la domoj; la homoj, kelkaj elĵetantaĵoj malpuraĵojn, aliaj laŭpove rebonigantaĵoj fenestro-klapojn, aliaj grupiĝintaĵoj, por lamenti kune; kaj ĉe l' paso de l' kaleŝo, manoj almozpete etenditaĵoj al ambaŭ kaleŝ-fenestroj.

Kun tiaj bildoj, jen antaŭ la okuloj, jen en la menso, kaj

⁸ *sarmientoj*: flekseblaj vito- branĉoj.

atendante trovi ion similan en sia hejmo, ili alvenis al ĝi; kaj fakte ili trovis kiel imagite.

Agnese demetigis siajn pakaĵojn en angulo de la korteto, kiu estis la plej pura loko el la tuta domo; kaj poste ŝi komencis balai, kolekti kaj re-ordigi la malmulton da aĵoj postlasitaj; ŝi venigis lignaĵiston kaj feraĵiston, por rebonigi la plej gravajn fuŝaĵojn, kaj poste rigardante po unu la donacitajn tukaĵojn, kaj kalkulante tiujn novajn oraĵojn, ŝi diris al si mem: – Mi eltiriĝis feliĉe; estu danko al Dio kaj la Madono, kaj al tiu bonkora senjoro: mi ja rajtas diri, ke mi elturniĝis feliĉe –.

Don Abbondio kaj Perpetua eniras la hejmon, sen ŝlosiloj; ĉe ĉiu paŝo en la koridoro, ili sensas kreskantan haladzon, venenon, peston, kiu repuŝas ilin; kun mano ĉe l' nazo, ili iras al la kuireja pordo; ili enpaŝas piedpinte, zorgante, kien la piedojn meti, por laŭeble eviti la malpuraĵon kiu kovras la plankon; kaj ili ĉirkaŭrigardas. Nenio estis sendifekta, sed ĉiuloke vidiĝis restaĵoj kaj fragmentoj de aĵoj ĉeestintaj tie kaj aliloke: plumetoj kaj plumoj de l' kokinoj de Perpetua, pecoj de tukoj, paĝoj el la kalendaroj de Don Abbondio, rompaĵoj de kaldronoj kaj teleroj; ĉio amase aŭ dise. Nur en la fajrujo videblis la kunmetitaj signoj de vasta rabado, kiel multaj ideoj aluditaj en propozicio verkita de bontonulo. Mi volas diri: videblis restaĵo de estingitaj ŝtipoj kaj ŝtipetoj, montrantaj, ke ili estintis seĝa brak-apogilo, tablo-piedo, ŝranko-pordeto, lita tabulo, daŭbo de la bareleto, kie iam kuŝis la vino kapabla rebonigi la stomakon de Don Abbondio. La resto estis cindro kaj karberoj; kaj per ĉi-lastaj la fuŝistoj desegnaĉis por amuzo sur la muroj bildaĉojn, klopodante per iuj biretoj kaj tonsuroj,

per larĝaj amelaj kol-bendoj⁹, bildigi pastrojn, kun granda klopodo ilin prezenti hororaj kaj ridindaj: intenco, kiu verdire tute ne povis malsukcesi ĉe tiaj artistoj.

«Ha porkaĉoj!» elkriis Perpetua. «Ha kanajlaĉoj!» elkriis Don Abbondio; kaj kvazaŭ fuĝe ili eliris tra alia pordo, kiu kondukis al la legom-ĝardeno. Ili ekspiris; kaj rekte iris al la figarbo; sed jam antaŭ ol alveni, ili vidis la teron disfosita, kaj ambaŭ eligis kriegon; fakte, alveninte, anstataŭ la kadavron¹⁰, ili trovis la fosaĵon malkovrita. Ĉe tio ekestis plendegoj: Don Abbondio komencis kulpigi Perpetua-n, ke ŝi ne bone kaŝis: imagu, ĉu ĉi-lastata restis silenta: post ega kriado, ambaŭ, kun la etendita brako, kaj la montro-fingro celumita al la fosaĵo, revenis kune, grumblante. Kaj vi taksu, ke ĉiuloke ili trovis ion similan. Ili penis mi ne scias kiom longe, por disponigi balaadon kaj malvenenigon de la domo, des pli ke en tiuj tagoj estis malfacile trovi helpanton; kaj mi ne scias kiom longe ili devis loĝi kvazaŭ tendume, aranĝante sin laŭpove, refarigante iom post iom pordo-klapojn, meblojn, laborilojn, per la mono prunte donita de Agnese.

Aldone al tio, tiu malfeliĉo estis semo de aliaj tre ĝenaj disputoj; ĉar Perpetua, danke al persista demandado kaj esploro, gvatado kaj flarado, eksciis tute certe, ke iuj domgarnaĵoj de ŝia mastro, taksitaj predo aŭ detruaĵo de l' soldatoj, male troveblis tute sendifektaj en domoj de vilaĝanoj; kaj ŝi ĝene insistaĉis, ke la mastro aŭdigu sian voĉon kaj postulu siajn proprietaĵojn. Pli abomenan klavon oni ne povus tuŝi ĉe

⁹ *biretoj* (= pastraj ĉapoj)... *tonsuretoj* (razitaj kapvertoj)... *kol-bendoj* (pastraj kolumoj): la landkneĥtoj divenis ke temas pri domo de pastro; tial ili faris ĉi-koncernajn karikaturojn.

¹⁰ *kadavron*: ironie = monon.

Don Abbondio; ĉar liaj havaĵoj estis en manoj de kanajloj, tio estas la speco de homoj, kun kiuj li tute volis gardi pacon.

«Sed mi nenion volas ekscii pri tiaĵoj», li diris. «Kiomfoje mi ripetu, ke tio kio perdiĝis, perdiĝis? Ĉu mi eĉ krucumiĝu, pro tio, ke oni prirabis mian domon?».

«Mi ja diras, ke vi eĉ permesus, ke oni eligu la okulojn el via kapo. Priŝteli aliajn estas peke. Sed koncerne vin, peke estas ne ŝteli».

«Sed vidu, ĉu da tiaj stultaĵoj oni povas diri!» replikis Don Abbondio: «Sed ĉu vi ne volas silenti?».

Perpetua kvietiĝis, sed ne tuj-tuj; kaj ŝi ĉion ajn pretekstigis, por reparoli. Tiel ke la povrulo reduktiĝis al tio, ke li ne plu plendis, kiam li rimarkis la mankon de io, en la momento kiam li ĝin bezonis; ĉar plurfoje li devis aŭdi, kiel respondon: «iru postuli ĝin ĉe tiu-tia, kiu havas ĝin, kaj kiu ne ĝin tenus ĝis nun, se li ne havus koncernon kun sentaŭgulo».

Alian, pli vivan zorgon al li kaŭzis la sciiĝo pri ĉiutaga trapaso de sporadaj soldatoj, kiel tro ĝuste li estis konjektinta; tiel ke li daŭre suspektis, ke li vidos aperi unuopulon aŭ eĉ grupon ĉe lia pordo, kiun li estis urĝe reboniginta kiel unuan aferon, kaj kiun li tenis ŝlosita kun granda zorgo; sed, dank' al Dio, tio neniam okazis. Tamen, tiuj ĉi teruroj ankoraŭ ne ĉesis, kiam ilin trafis iu nova.

Sed ĉi tie ni neglektos la povrulon: nun temas pri tute alio ol liaj privataj timoj, ol malfeliĉoj de kelke da vilaĝoj, ol momenta katastrofo.

XXXI

La pesto, kies eniron en Milanion kune kun la germanaj bandoj la sanitara tribunalo jam timis, eniris fakte, kiel konate; kaj same estas konate, ke ĝi ne restis tie, sed invadis kaj senhomigis grandan parton de Italujo. Kondukate per la fadeno de nia historio, ni rakontas nun la ĉefajn eventojn de tiu plago koncerne Milanion, eĉ preskaŭ nur Milanon: ĉar preskaŭ nur pri la urbo parolas tiuepokaj kronikoj, kiel okazas preskaŭ ĉiam kaj ĉie, pro bonaj kaj malbonaj kialoj. Kaj en tiu ĉi rakonto nia celo estas, verdire, ne nur bildigi la situacion, en kiu troviĝos niaj roluloj; sed samtempe konatigi, kiel eblas per resumo, kaj kiom eblas niaflanke, parton de patruja historio pli fama ol konata.

El la multaj tiuepokaj raportoj, neniuj per si sola sufiĉus, por havigi pri la afero ideon iom klaran kaj bonordan; same kiel neniuj estas, kiu ne povas kontribui, por estigi ĝin tia. En ĉiuj unuopaj raportoj, inkluzive tiun de Ripamonti,¹ kiu ĉiujn superas per la kvanto kaj elekto de la eventoj, kaj eĉ pli multe per la maniero, kun kiu li observas ilin, neglektiĝis gravaj okazaĵoj, kiuj estas raportitaj en aliaj; en ĉiu konstateblas faktaj eraroj, kiujn oni povas rekoni kaj ĝustigi per la helpo de alia, aŭ per la malmultaj post-restantaj aktoj de la publika aŭtoritato, eldonitaj kaj neeldonitaj; ofte en unu raporto troviĝas la kaŭzoj, kies efikoj vidiĝis en alia, kvazaŭ en-aere. En ĉiuj krome regas stranga konfuzo de tempoj kaj aferoj; estas senĉesa kvazaŭ hazarda zigzagado, sen ĝenerala nek detala plano: kio cetere estas plej komuna kaj evidenta

¹ Josephi Ripamontii, canonici scalensis, chronistae urbis Mediolani, *De peste quae fuit anno 1630*, Libri V. Mediolani 1640, apud Malatestas (N. d. A.).

karaktero de l' tiuepokaj libroj, ĉefe ne latinlingvaj, almenaŭ en Italujo: ĉu ankaŭ en la cetera Eŭropo, tion supozeble ja scias kleruloj: ni ĝin suspektas. Neniu historiisto el pli postaj epokoj entreprenis ekzameni kaj kompari tiujn kronikojn, por eltiri ordigitan serion de tiuj eventoj, historion de tiu pesto; tiel ke ĝenerala ideo pri ĝi estas tute malcerta kaj iom konfuza: nedefinita ideo pri grandaj malfeliĉoj kaj grandaj fuŝaĵoj (verdire estis da unuj kaj aliaj, pli multe ol imageble), ideo konsistanta pli el pritaksoj ol el faktoj, iuj sporadaj faktoj, ofte sen akompano de plej karakterizaj cirkonstancoj, sen tempa distingo, tio estas sen kompreno de kaŭzo kaj efiko, de procezo, de evoluo. Ni, esplorante kaj komparante, almenaŭ kun granda diligento, se ne alie, ĉiujn presitajn raportojn, plurajn neeldonitajn, multajn (proporcie kun la malmulto kiu postrestas) dokumentojn laŭdire oficialajn, ni klopodis fari, certe ne ĉion deziratan, sed almenaŭ parton de tio, kio ankoraŭ ne estas farita. Ni ne intencas raporti ĉiujn publikajn aktojn, nek ĉiujn okazintaĵojn iel memorindajn. Des malpli ni pretendas superfluigi, al eventuala deziranto ekhavi pli kompletan ideon pri la afero, la legadon de la originalaj raportoj: ni tro multe konscias, kia viva, speciala kaj, se tiel diri, ne komunikebla forto ĉiam enestas en tiuspecaj verkoj, kiel ajn konceptitaj kaj redaktitaj. Ni nur provis distingi kaj kontroli la plej ĝeneralajn kaj gravajn faktojn, ilin ordigi laŭ ilia efektiva sinsekvo rilate sencon kaj esencon, observi ilian reciprokan efikon, kaj tiel havigi por-momente, ĝis aliulo faros tion pli bone, noticon koncizan, sed verdiran kaj kontinuan, pri tiu katastrofo.

Laŭ la tuta teritoria voj-linio tramarŝita de la armeo, troviĝis fakte kelke da kadavroj en la domoj, kelke surstrate.

Post nemulte, en ĉi tiu kaj tiu vilaĝo komencis malsaniĝi kaj morti homoj, eĉ tutaj familioj, el morboj drastaj, strangaj, kun simptomoj nekonataj de plej granda parto de l' vivantoj. Estis nur kelke da homoj, al kiuj ili ne aspektis novaj: la malmultaj kiuj povis memori pri la pesto, kiu antaŭ kvindek tri jaroj ankaŭ senhomigis grandan parton de Italujo, kaj speciale Milanion, kie ĝi estis kaj ankoraŭ estas nomita pesto de sankta Karlo². Tia estas la forto de karitato! Inter tiel diversaj kaj solenaj memoraĵoj pri ĝenerala malfeliĉo, la karitato kapablas unuarangigi la memoron pri unu homo, ĉar al li ĝi inspiris sentojn kaj agojn eĉ pli memorindajn ol la malfeliĉo mem; ĝin stampi en la mensojn, kvazaŭ sukron de ĉiuj tiuj malfeliĉaĵoj, ĉar en ilin la karitato enpelis kaj enmiksitis lin kiel gvidanton, helpanton, modelon, memvolan viktimon; fari el ĝenerala malfeliĉego kvazaŭ entreprenaĵon por li; nomiĝi el li, kvazaŭ ĝi estus lia konkeraĵo, aŭ malkovraĵo.

Ĉefmedicinisto Lodovico Settala, kiu ne nur tiun antaŭan peston vidis, sed estis unu el ties plej aktivaj, aŭdacaj kaj, kvankam tiam tute juna, plej renomaj kuracintoj; kaj kiu nun, tute suspektante ĝin, estis alarmo-preta kaj sciiĝema, la 20-an de oktobro raportis en la Sanitara tribunalo, ke en la regiono de Chiuso (lasta en la teritorio de Lecco, kaj limlanda kun la Bergama teritorio), eksplodis sendube la kontaĝo. Kaj tamen oni nenion rezoluciis, kiel konstateblas el la Raporto de Tadino³.

Kaj jen alvenas similaj avizoj el Lecco kaj Bellano. Tiam la tribunalo rezoluciis kaj degnis sendi komisaron, kiu survoje

² Sankta Karlo Borromeo (1538-1584), kuzo de Federigo kaj lia antaŭulo kiel ĉefepiskopo de Milano, famis pro sia karitato helpe al pestuloj.

³ Paĝo 24 (N. d. A.).

prenu kun si kuraciston en Como, kaj kun li iru viziti la menciitajn lokojn. Ambaŭ, «au pro malklereco au pro alia kauzo sin lasis persvadi de maljuna kaj malklera barbiro el Bellano, ke tiaj malsanoj ne estas Pesto»⁴, sed en iuj lokoj, kutima efiko de aŭtunaj marĉaj elvaporajoj, kaj aliloke efiko de l' ĝenoj kaj mistraktoj suferitaj ĉe l' trapaso de l' germanoj. Tia aserto estis raportita al la tribunalo, kiu, ŝajnas, pacigis sian koron.

Sed, ĉar senĉese alvenis el diversaj flankoj pluaj kaj pluaj sciigoj pri mortoj, du delegitoj estis senditaj por esplori kaj dispozicii: la menciita Tadino, kaj unu tribunal-aŭditoro. Kiam ĉi-lastaj alvenis, la morbo jam tiom disvastiĝis, ke la pruvoj sin prezentis sen esploro. La du viroj trairis la Leccoteritorion, Valsassina-n, la bordojn de la lago de Como, la distriktojn nome Monte di Brianza kaj Gera d' Adda; kaj ĉie ili trovis vilaĝojn kun enirejoj fermitaj per krad-pordegoj, kaj aliajn preskaŭ senhomaj, kaj la loĝantojn forkurintaj kaj tendumantaj en-kampare, aŭ disperdiĝintaj; «kaj chiuj al ni shajnis», diras Tadino, «sovaghaj kreitajhoj, portantaj enmane mento-herbon au ruton au rosmarenon au boteleton de vinagro»⁵.

Ili informiĝis pri la kvanto da mortintoj: ĝi estis terura; ili vizitis malsanulojn kaj kadavrojn, kaj ĉie ili trovis la aĉajn kaj terurajn signojn de pesto. Ili tuj perletere transdonis tiujn sinistrajn novaĵojn al la Sanitara tribunalo, kiu, ricevinte ilin la 30-an de oktobro, «dispoziciis», diras tiu sama Tadino, preskribi atestilojn por forteni de la Urbo la homojn venantajn

⁴ Tadino, samloke (N. d. A.).

⁵ Tiuepoke iuj vegetaĵoj (ekz. mento, ruto, rosmareno) kaj vinagro estis taksataj medikamentoj.

de lokoj, kie la kontaĝo manifestiĝis, «kaj atende redakton de kriaĵo», ĝi donis pri tio anticipajn supraĵajn ordonojn al la akcizistoj.

Intertempe la delegitoj dekretis plej rapide ĉiujn dispoziciojn, kiuj al ili ŝajnis plej bonaj; kaj ili revenis kun la ĉagrena konvinko, ke tiaj dispozicioj ne sufiĉos por rimedi kaj haltigi malsanon jam tiom progresintan kaj disvastiĝintan.

Alveninte la 14-an de novembro, kaj farinte raporton, parole kaj denove skribe, al la tribunalo, ili estis de ĝi komisiitaj aliri al la guberniestro, kaj al li prezenti la staton de la aferoj. Ili do aliris, kaj poste ili raportis: ke la guberniestro eksentis pro tiaj novaĵoj multe da bedaŭro, esprimis pri ĝi grandan kunsentegon; sed la zorgoj pri l' milito estas pli urĝaj: *sed belli graviores esse curas*⁶. Tiel skribas Ripamonti, kiu esploris la registrojn de la Sanitara organo, kaj interparolis kun Tadino, speciala komisiito pri la misio: ĝi estis la dua, se la leganto memoras⁷, por tiu sama celo, kaj kun sama rezulto. Post du aŭ tri tagoj, la 18-an de novembro, la guberniestro eligis kriaĵon, per kiu li ordonis publikajn festojn pro la naskiĝo de Karlo, unuanaskito de reĝo Filipo la 4-a, ne suspektante, aŭ ne konsiderante la danĝeron devenantan el granda hom-amasiĝo en tiaj cirkonstancoj: ĉio kiel en ordinaraj tempoj, kvazaŭ li estus pri nenio avertita.

Temis, kiel jam dirite, pri la fama Ambrogio Spinola, sendita por rektigi tiun militon kaj rebonigi la fuŝaĵojn de Don Gonzalo, kaj, parenteze, por guberniestri; kaj ni povas ĉi tie same parenteze mencii, ke li mortis post malmulte da monatoj, en tiu sama milito, por kiu li tiom multe zorgis; kaj li mortis

⁶ *sed... curas*: latine = sed pli gravas milito-zorgoj.

⁷ *memoras*: kp. ĉap. XXVIII.

tute ne pro vundoj sur batalkampo, sed sur lito, pro angoro kaj korŝiro, pro riproĉoj, maljustaĵoj kaj ĉiuspecaj ĉagrenoj flanke de tiuj, kiujn li servis. La historio bedaŭris lian sorton, kaj mallaŭdis alies maldankemon; priskribis tre diligente liajn militajn kaj politikajn heroaĵojn, laŭdis liajn antaŭzorgemon, aktivemon, konstantecon: la historio devus ankaŭ esplori, kiel li eluzis ĉiujn ĉi ecojn, kiam la pesto minacis kaj invadis la popolon konfiditan al lia zorgo, aŭ pli ĝuste al lia arbitro.

Sed, se lasi tiun tutan mallaŭdon sentuŝa, tio kio malpliigas la miron pro tiu konduto, kaj estigas alian pli fortan, estas la konduto de la popolo mem: mi aludas tiun parton de la popolo, kiu, ankoraŭ ne tuŝite de la kontaĝo, havis tiel grandan motivon por ĝin timi. Ĉe l' alveno de tiuj novaĵoj el vilaĝoj tiel aĉe kontaĝitaj, vilaĝoj formantaj ĉirkaŭ la urbo kvazaŭ duoncirklon, iuloke distancaj ne pli ol dek ok aŭ dudek mejloj; kiu ne supozus, ke tie estiĝis ĝenerala movado, deziro de taŭgaj aŭ maltaŭgaj preventoj, aŭ almenaŭ senfrukta malkvieto? Male, pri unu afero la tiamaj kronikoj konsentas, nome ke nenio tia okazis. La magra rikolto de la lasta jaro, la mistraktoj de la soldataro, la spiritaj afliktoj, ŝajnis pli ol sufiĉaj por klarigi la mortadon: sur la placoj, en la butikoj, en la domoj, se iu eventuale aludis la danĝeron, se iu menciis peston, tiun trafis malkredaj moko, kolerplena malŝato. Sama malkredo, pli ĝuste: sama blindeco kaj obstino regis en la senato, en la dekestra Konsilio, en ĉiu publika magistrat-fako.

Mi trovas ke kardinalo Federigo, tuj kiam sciiĝis la unuaj kazoj de kontaĝa morbo, per paŝtista letero al la parokestroj preskribis interalie admoni plurfoje la popolon pri la graveco kaj strikta devo malkaŝi ĉian akcidenton tian, kaj liveri la

infektajn aŭ suspektajn aĵojn:⁸ kaj ankaŭ tio povas esti kalkulita inter liaj laŭdindaj unikaĵoj.

La Sanitara tribunalo petis, petegis kunlaboron, sed ĝi ricevis malmulte aŭ tute nenion. Kaj en la tribunalo mem, la zorgo estis tute sentaŭga: kiel deklaras plurfoje Tadino, kaj kiel eĉ pli bone rezultas el la tuta kunteksto de lia raporto, nur la du medicinistoj, konvinkite pri l' graveco kaj urĝo de la danĝero, stimulis la tribunalon, kiu siavice stimuli devus la aliajn.

Ni jam vidis kiel, ĉe l' unua anonco pri la pesto, la tribunalo estis senfervora ĉe aktivado, kaj eĉ ĉe kolekto de sciigoj: nun jen alia ne malpli miriga kazo de malrapideco, almenaŭ se ĝin ne devigis malhelpoj flanke de pli superaj ŝtataj funkciuloj. Tiu kriaĵo pri la atestiloj, rezoluciite la 30-an de oktobro, estis redaktita nur la 23-an de la sekva monato, kaj publikigita nur la 29-an, kiam la pesto jam eniris Milanon.

Tadino kaj Ripamonti volis noti la nomon de ties unua enkondukinto, kaj aliajn cirkonstancojn pri la persono kaj la kazo: kaj fakte, konsiderante la komencojn de vasta mortado, kies viktimojn oni apenaŭ povos indiki laŭ proksimuma kvanto da miloj, des malpli distingi laŭnome, naskiĝas mi ne scias kia scivolo ekkoni tiujn unuajn nemultajn nomojn, kiujn oni sukcesis noti kaj gardi: tiu ĉi speco de privilegio, nome la prioritato ĉe ekstermado laŭŝajne trovigas ion fatalan kaj memorindan en ili kaj en ties detaloj, aliflanke tute indiferentaj.

Ambaŭ historiistoj diras ke temis pri itala soldato, dungita por Hispanujo; pri la cetero ili ne tute konsentas, eĉ ne pri la

⁸ *Vivo de Federigo Borromeo*, kompilita de Francesco Rivola, Milano, 1666, paĝo 582 (N. d. A.).

nomo. Ĝi estis, laŭ Tadino, iu Pietro Antonio Lovato, kantonmenta en la Lecco-teritorio; laŭ Ripamonti ĝi estis Pier Paolo Locati, postena en Chiavenna. Ili diferencas eĉ koncerne la daton de lia eniro en Milanon: la unua datigas ĝin je la 22-a de oktobro, la dua je la tioma de la sekva monato: nek la unua nek la alia estas kredinda. Ambaŭ datoj kontraŭdiras aliajn tute pli certajn. Kaj tamen Ripamonti, skribante laŭ ordono de la ĝenerala Konsilio de l' Dekestroj, nepre disponis multe da rimedoj por kolekti la necesajn sciigojn; kaj Tadino, pro sia ofico, povus ricevi informojn pri ĉi-speca afero pli ekzakte ol ajna aliulo. Cetere, el komparo kun aliaj datoj, kiuj al ni ŝajnas, kiel ni diris, pli ĝustaj, rezultas ke tio okazis antaŭ la publikigo de la kriaĵo pri sanitaraj atestiloj; kaj, se la afero valorus, oni povus eĉ pruvi, aŭ preskaŭ pruvi, ke tio okazis en la unuaj tagoj de tiu monato; sed certe la leganto liberigas nin de tia detalado.

Iel ajn eniris tiu infanteriano malfeliĉa kaj portanto de malfeliĉo, kun granda volv-pakaĵo el vestaĵoj aĉetitaj aŭ ŝtelitaj ĉe germanaj soldatoj; li pasloĝis ĉe parencoj, en la kvartalo de Orienta Pordego, apud la kapucenejo; tuj post sia alveno, li malsaniĝis; oni lin portis al la malsanulejo, kie bubono malkovrita sub lia akselo, suspektigis la flegantojn pri tio, kio fakte estis; la kvaran tagon li mortis.

La Sanitara tribunalo ordonis trud-izoli hejme lian familion; liaj vestaĵoj kaj la lito, sur kiu li kuŝis en la malsanulejo, estis bruligitaj. Ankaŭ du servantoj, lin flegintaj, kaj bonkora monako, lin asistinta, post ne multe da tagoj malsaniĝis, ĉiuj je pesto. La dubo, tie tuj estiĝinta, pri la esenco de tiu malsano, kaj la konsekvencaj antaŭzorgoj, limigis pluan disvastiĝon de la kontaĝo en tiu loko.

Sed la soldato estis dislasinta aron da semoj, kiuj ne malrapidis ĝermi. La unua trafito estis la mastro de la domo, kie li pasloĝis: iu Carlo Colonna, liut-ludisto⁹. Tiam, laŭ ordono de la Sanitara tribunalo, oni ĉiujn luantojn de tiu domo kondukis al la lazareto, kie plej granda parto malsaniĝis; kelkaj mortis post nemulte, evidente pro kontaĝo.

En la urbo, tio kio jam estis dissemita de tiuj pestuloj, de iliaj vestaĵoj, de iliaj mebloj, kiujn parencoj, luantoj, servantoj kaŝe forrabis de la esploroj kaj de la fajro preskribita de la tribunalo; kaj krome, tio kio denove en la urbon eniradis, pro l' malperfekto de l' ediktoj, pro l' maldiligento ĉe ties plenumo, pro ties lerta evitado, malrapide kovadis kaj kaŝ-cirkulis dum la cetera parto de tiu jaro, kaj la unuaj monatoj de la 1630-a. De temp' al tempo, jen en unu, jen en alia kvartalo, iu estis infektata, kelkiu eĉ mortis: kaj la malofteco mem de l' kazoj forigis la suspekton pri la vero, pli kaj pli konfirmis la publikon en tiu stulta kaj katastrofa fidemo, ke ne aktualas pesto, ke ĝi eĉ ne momente ĉeestis. Multe da kuracistoj, reeĥante la voĉon de la popolo, (ĉu ĝi estis, ankaŭ ĉi-kaze, voĉo de Dio?¹⁰), ankoraŭ primokis la sinistrajn aŭgurojn, la minacajn avertojn de l' malmultaj; kaj ili disponis nomojn de komunaj malsanoj, por difini ĉian kazon de pesto, por kies kuraco oni ilin venigis; indifere, kun kia simptomo, kun kia signo ĝi montriĝis.

La avizoj pri tiuj ĉi akcidentoj, se almenaŭ ili atingis la Sanitaran buroon, plej grandparte alvenis malfruaj kaj malcertaj. La teruro pri kvaranteno kaj lazareto akrigis ĉies cerbojn: oni la malsanulojn ne denunciis, oni koruptis la

⁹ *liuto*: kord-muzikilo.

¹⁰ aludo al la proverbo: "Popola voĉo, Dia voĉo",

entombigistojn kaj iliajn superulojn; eĉ oficistoj de la tribunalo, de ĝi komisiitaj viziti kadavrojn, kontraŭ mono havigis falsajn atestilojn.

Sed ĉar la tribunalo, ĉe ĉiu malkovro, kiun ĝi sukcesis fari, ordonis bruligi aĵojn, kvarantenigis domojn, en-lazaretigis familiojn, facile konjekteblas kiom grandis kontraŭ la tribunalo la kolero kaj grumblado de la publiko «de Nobelaro, de Komercistoj, kaj de plebo», diras Tadino; ĉar ĉiuj estis konvinkitaj, ke temas pri senmotivaj kaj sensencaj ĉikanoj. La malamo trafis ĉefe la du kuracistojn; la menciitan Tadinon, kaj Senatore-n Settala, filon de la ĉefmedicinisto: tiomgrade ke ili ne plu povis trairi placojn sen agresoj per insult-vortoj, aŭ eĉ per ŝton-ĵetoj. Kaj certe tiuj du viroj troviĝis en tute stranga kaj memorinda situacio dum kelke da monatoj: vidi teruran plagon progresi, ĉiumaniere klopodegi por ĝin deturni, kaj trovi malhelpon ĝuste tie, kie ili serĉis helpon, kaj samtempe esti celo de insult-krioj, esti nomataj malamikoj de l' patrujo: *pro patriae hostibus*¹¹, diras Ripamonti.

Parto de tiu malamo trafis ankaŭ la aliajn kuracistojn, kiuj konvinkite, same kiel ĉi tiuj, pri la realeco de la kontaĝo, sugestis antaŭzorgojn, klopodis komuniki al ĉiuj sian doloran certecon. La plej diskretaj difinis ilin dupaj kaj obstinaj; laŭ la ceteraj temis pri evidenta mensogado, kabalo komplotita por elprofiti la publikan teruron.

Ĉefmedicinisto Lodovico Settala, tiam preskaŭ okdek-jara, iama profesoro pri medicino ĉe l' universitato de Pavia, kaj pli poste pri morala filozofio en Milano, aŭtoro de verkoj tiam tre renomaj, fama pro invitoj al katedroj de aliaj universitatoj, nome Ingolstadt, Pisa, Bologna, Padova, kaj pro

¹¹ *pro patriae hostibus*: latine = kiel malamikoj de la patrujo.

l' rifuzo de ĉi-ĉiuj invitoj, estis certe unu el la plej prestiĝaj homoj de sia epoko. Al la reputacio pri lia scienco aldoniĝis tiu pri lia vivo, kaj al la admiro la korfavoro pro lia granda karitato ĉe l' kuracado kaj bonfarado al malriĉuloj. Kaj, afero, kiu en ni perturbas kaj ĉagrenas la estimon pro tiuj meritoj, sed kiu tiam certe igis tiun estimon pli ĝenerala kaj forta, la povra homo partoprenis en la plej komunaj kaj fatalaj antaŭjuĝoj de sia epoko: li anticipis, sed sen forlasi la amason: afero, kiu altiras malfeliĉojn, kaj ofte forigas prestiĝon alimaniere gajnitane. Kaj la grandega prestiĝo, kiun li ĝuis, ne nur ne sufiĉis ĉi-kaze por venki la opinion de tiu, kiun poetoj nomas popolaĉo profana, kaj la trupestroj¹² respektinda publiko; sed ĝi eĉ ne sukcesis for-savi lin el la kolero kaj la insultoj de tiu popol-parto, kiu plej facile el pritaksoj transiras al manifestacioj kaj faroj.

Iun tagon, dum li sur sid-portilo veturis por viziti siajn malsanulojn, ekamasiĝis popolo ĉirkaŭ lin, kriante ke li estas la ĉefo de tiuj kiuj tute pretendas, ke aktualas pesto; ke li teruras la urbon, per sia tiu-speca rigardaĉo, per tiu tia barbaĉo: ĉio por laborigi kuracistojn. Popolamaso kaj furiozo pli kaj pli kreskis: la portistoj, vidante la danĝeran situacion, rifuĝigis la mastron en hejmon de amikoj, bonŝance situantan apude. Tio ĉi lin trafis, pro tio ke li vidis klare, ke li diris la realon, ke li intencis savi el pesto milojn da homoj. Kiam male, per sia bedaŭrinda konsulto, li kunlaboris por torturigi, tenajlumi, kaj kiel sorĉistinon ŝtiparumi malfeliĉan povrulinon, pro tio ke ŝia mastro suferis je strangaj stomakdoloroj, kaj ke alia, antaŭa mastro profunde enamiĝis je ŝi,¹³ tiam li tre verŝajne ricevis de l' publiko denovan laŭdon,

¹² *trupestroj*: ĉeffaktoroj de teatraj grupoj.

kvazaŭ saĝulo, kaj, netolereble por pensi, novan bonmeritecon.

Sed ĉe l' fino de l' monato marto, antaŭe en kvartalo de la Orienta Pordego, poste en ĉiu urbo-parto, komencis multiĝi la malsanoj, la mortoj, kun strangaj simptomoj de spasmoj, palpacioj, letargio, deliro, kun tiuj mort-anoncaj signoj el bluaĵoj kaj bubonoj; mortoj plej ofte rapidaj, perfortaj, ne malofte subitaj, sen antaŭa malsan-simptomo. La kuracistoj kontraŭaj al la opinio pri kontaĝo, ne volante nun konfesi tion, kion ili iam primokis, kaj devante tamen doni ĝeneralan nomon al la nova malsano, jam nun tro komuna kaj tro evidenta, por resti sentitola, eltrovis la nomojn malignaj febroj, pestaj febroj: mizera elturniĝo, eĉ fripona vortotrompaĵo, kiu kaŭzis grandan damaĝon; ĉar, ŝajnigante rekoni la veron, ĝi sukcesis plu malkredigi tion, kion plej gravis kredi kaj vidi: nome ke la malsano infektas per kontakto. La magistratanoj, kvazaŭ vekiginte el profunda dormo, komencis konsideri iom plimulte la avizojn kaj proponojn de la Sanitara buroo, plenumi ties ediktojn, la izolojn ordonitajn kaj la kvarantenojn preskribitajn de tiu tribunalo. Ĉi lasta daŭre petis ankaŭ monon, por kovri la pliiĝantajn ĉiutagajn elspezojn de la pestulejo, kaj de multe da aliaj servoj; ĝi petis ĝin je la dekestroj, atende ke oni decidu (kio, mi kredas, neniam okazis formale, sed nur fakte) ĉu debeti la urban magistraton aŭ la reĝan fiskon. Ankaŭ la grand-kanceliero urĝis la dekestrojn, ordone ankaŭ de la guberniestro, kiu estis reirinta sieĝi la kompatindan Casale-n; urĝis la senato, por ke ili zorgu provianta la urbon, antaŭ ol estos malpermesata komerco kun

¹³ *Historio de Milano*, de Grafo Pietro Verri; Milano, 1825, Vol. 4, paĝo 155 (N. d. A.).

eksterlando, se bedaŭrinde la kontaĝo disvastiĝus; por ke ili trovu rimedon por vivteni grandan parton de la loĝantaro, restinta sen laboro. La dekestroj klopodis akiri monon per pruntoj, per impostoj; kaj el la kolektita mono ili donis parton al la Sanitara buroo, parton al la malriĉuloj: iom da tritiko ili aĉetis: ili plenumis parton de la bezonoj. Kaj la grandaj angoroj ankoraŭ estis venontaj.

En la lazareto, kies loĝantaro, malgraŭ ĉiutaga dekumado, pli kaj pli kreskis ĉiutage, alia malfacila entreprenaĵo estis garantii servon kaj disciplinon, observi la preskribitajn apartigojn, entute gardi, aŭ pli ĝuste estigi la regadon kiun ordonis la Sanitara tribunalo: ĉar ek de la unuaj momentoj ĉio estis en granda konfuzo, pro la senbrideco de la enfermitoj, pro la malzorgo kaj koluzio de l' servantoj. La tribunalo kaj la dekestroj, ne sciante kiel solvi la problemon, elpensis turni sin al la kapucenoj, kaj petegis la patron komisaron de la kapucena provinco, kiu anstataŭis la provincialon, mortintan antaŭ nemulte, ke li disponigu homojn lertajn regi tiun tute malfeliĉan regnon. La komisararo proponis kiel reganton iun patron Felice Casati, matur-aĝan viron, kiu ĝuis grandan famon pri karitato, klopodemo, mildeco kaj samtempe energio, famon tute laŭmeritan, el tio kion li pli poste montris; kaj kiel lian kunulon kaj helpanton, iun patron Michele Pozzobonelli, ankoraŭ junan, sed dignan kaj severan, rilate kaj pensojn kaj aspekton. Oni akceptis ilin kun granda plezuro; kaj la 30-an de marto ili eniris la pestulejon. La Sanitara prezidanto ĉirkaŭkondukis ilin, kvazaŭ por ekposedi ĝin; kaj kunveniginte ĉiu-gradajn servantojn kaj oficistojn, li fronte al ili deklaris patron Felice prezidanto de tiu loko, kun senpera kaj plena aŭtoritato. Poste, laŭgrade ke la mizera homkolekto

kreskis, alvenis aliaj kapucenoj; kaj ili rolis en tiu loko kiel regantoj, konfesprenantoj, mastrumantoj, flegistoj, kuirantoj, vesto-zorgistoj, tuk-lavistoj, ĉio ajn bezonata. Patro Felice, ĉiam laca kaj ĉiam zorgo-plena, rondiris tage, rondiris nokte, tra la portikoj, tra la ĉambroj, tra tiu vasta interna spaco, foje havante bastoneton, alfoje armite nur per sia pento-zono; li ĉion animis kaj reguligis; li pacigis tumultojn, solvis kverelojn, minacis, punis, riproĉis, konsolis, viŝis kaj verŝis larmojn. Ĉe l' komenco lin trafis pesto; li resaniĝis, kaj revenis kun nova fervoro al la antaŭaj zorgoj. Plej granda parto de liaj kunfratoj perdis tie la vivon, ĉiuj kun ĝojo.

Certe, tia diktaturo¹⁴ estis stranga rimedo; stranga kiel la plago, kiel la epoko; kaj eĉ se ni pri ĉi-afero nenion alian scius, sufiĉus jeno kiel pruvo, eĉ kiel specimeno de socio tre kruda kaj mis-regata: vidi ke la homoj havantaj la taskon plenumi tiom gravan regadon, nenion alian kapablis, krom cedi ĝin, kaj ke ili trovis neniun, al kiu ĝin cedi, krom homojn principe tute fremdaj al superregado. Sed tio estas samtempe ne malnobla specimeno de la energio kaj lerteco, kiujn la karitato povas doni en ĉia tempo kaj ĉia speco de aferoj, vidi ĉi tiujn virojn elporti tiel brave tian pezaĵon. Kaj bonis en si mem tio, ke ili akceptis ĝin, sen alia motivo, krom ke neniu alia ĝin akceptus, sen alia celo krom servi, sen alia espero en ĉi-mondo, krom morto multe pli enviinda ol efektive enviata; kaj bonis en si mem la propono farita al ili nur pro tio, ke ĝi estis malfacila kaj danĝera, kaj oni supozis ke la energion kaj sang-fridecon, tiel necesajn kaj tiel maloftajn en tiaj momentoj, ili certe havas. Kaj tial la aktivado kaj bonkoreco de tiuj fratoj meritas menciigi kun admiro, kun tenereco, kun

¹⁴ *diktaturo*: ĉi tie = severa disciplino.

tiu speco de danko-sento, kiun oni ŝuldas, kvazaŭ solidarece, por grandaj servoj de homoj al homoj, kaj des plimulte ŝuldata al tiuj kiuj dank-esprimon al si ne proponas kiel rekompenco. «Char se tiuj Patroj tie ne trovighus», diras Tadino, «certe tuta Urbo neniigita trovighus; char estis mirakla afero, ke tiuj Patroj dum tiom mallonga tempo faris tiom da aferoj por publika bonfaro; kiuj, ricevinte flanke de Urbo nenium au tre malmulte da helpo, per sia lerteco kaj prudenteco vivtenis en Lazareto tiom da miloj da malrichuloj». La gastigitoj en tiu loko, dum la sep monatoj en kiuj patro Felice ĝin regis, estis ĉirkaŭ kvindek mil, laŭ Ripamonti; kiu prave diras, ke pri tia viro li devus paroli, eĉ se anstataŭ priskribi la mizerojn de la urbo, li devus rakonti la aferojn kiuj ĝin honoras.

Ankaŭ en la publiko tia obstina neado de l' pesto kompreneble pli kaj pli cedis kaj perdiĝis laŭgrade ke la morbo disvastiĝis, kaj disvastiĝis per kontaktoj kaj interrilatoj; kaj des pli kiam ĝi, restinte iom da tempo nur inter malriĉuloj, komencis trafi pli famajn personojn. Kaj inter ili, kiel tiam li estis plej rimarkinda, tiel ankaŭ nun apartan mencion meritas ĉefmedicinisto Settala. Ĉu oni almenaŭ konfesis, ke la povra oldulo pravis? Kiu do scias? Malsaniĝis je pesto li mem, lia edzino, du gefiloj, sep servistoj. Li kaj unu el la gefiloj elsaviĝis; la ceteraj mortis. «Tiuj chi kazoj», diras Tadino, «okazinte en Urbo, en Nobelaj domoj, emigis Nobelaron kaj plebon pripensi, kaj nekredemaj Kuracistoj kaj neklera kaj senpensa popolacho komencis kunpremi lipojn, fermi dentojn, kaj kuntiri brovojn».

Sed foje la eltrovoj, la elturniĝoj, la venĝoj, se tiel diri, de l' konviktita¹⁵ obstineco, estas tiaj, ke oni volas tiun obstinon

¹⁵ *konviktita* = tute pruvita (jura termino).

senŝancele firma ĝisfine, kontraŭ racio kaj evidento: kaj ĝuste tiaĵo okazis tiam. La homoj, kiuj tiel rezolute kaj longe tute neis, ke apud ili, inter ili estas ĝermo de malsano kapabla per naturaj vojoj disvastiĝi kaj kaŭzi amas-mortigon, ne plu povante nei ties disvastiĝon, kaj ne volante atribui ĝin al tiuj vojoj (tio signifus konfesi samtempe grandan trompiĝon kaj grandan kulpon), des pli emis trovi ĝusta ajnan alian proponitan kaŭzon. Bedaŭrinde unu kaŭzo estis jam preta en la tiamaj komunaj ideoj kaj tradicioj, ne nur ĉi tie, sed en ĉiuj partoj de Eŭropo: nome venenistaj artoj, diablaj operacioj, homoj komplotintaj disvastigi peston per kontaĝaj venenoj, per sorĉaĵoj. Tiuj aŭ similaj aferoj estis jam supozitaj kaj kreditaj okaze de multe da aliaj pestoj, kaj ĉi tie speciale en la okazinta antaŭ duona jarcento. Oni aldonu ke ek de la antaŭa jaro alvenis depeŝo, subskribita de reĝo Filipo la 4-a, al la guberniestro, por lin averti, ke forkuris el Madrido kvar francoj, serĉataj ĉar suspektate dismeti venenajn pestajn ŝmiraĵojn: ke li viglu, ĉu ili eventuale atingis Milanon. La guberniestro komunikis la depeŝon al la senato kaj al la Sanitara tribunalo; sed ŝajnas ke tiumomente oni nemulte tion konsideris. Tamen, kiam la pesto jam estis eksplodinta kaj agnoskita, la memoro pri tiu avizo povis konfirmi la nedifinitan suspekton pri krima plano; ĝi povis esti eĉ la unua kaŭzo, por tiun suspekton estiĝi.

Sed du eventoj: unu el blinda kaj senbrida timo, la alia el mi ne scias kia malico, ŝanĝis tiun nebulan suspekton pri ebla atenco, en pozitivan suspekton, kaj laŭ multaj ĝi fariĝis certeco pri fakta atenco, pri efektiva konspiro. Iuj kiuj, vespere de la 17-a de majo, havis la impreson vidi homojn ŝmiri en la katedralo la tabularon, kiu dividis la spacojn destinitajn al la

du apartaj seksoj, ordonis forporti dumnokte el la preĝejo tiun lignan barilon kaj aron da benkoj ĉirkaŭbaritaj de ĝi; kvankam la Sanitara prezidanto, alrapidinte por esplori la aferon kun kvar homoj el sia buroo, ekzamenis la barilon, la benkojn, la sanktakvuojn, kaj trovis nenion, kio povus konfirmi la malkleran suspekton pri veneniga atenco; tamen, pli por komplezi alies imagojn, kaj *pli multe pro redundanca*¹⁶ *singardo, ol pro reala bezono*, li decidis, ke sufiĉas lavi tiun barilon. Tiu granda kvanto da amasigitaj aĵoj estigis teruregan impreson en la popolamaso, laŭ kiu materiaĵo tute facile fariĝas per si mem pruvaĵo. Oni diris kaj ĝenerale kredis, ke en la katedralo oni ŝmiris ĉiujn benkojn, la vandojn, kaj eĉ la ŝnurojn de la sonoriloj. Kaj ne nur tiam oni tion diris: ĉiuj kronikoj de l' samtempuloj, kiuj parolas pri tiu okazintaĵo (kelke el ili verkitaj post multe da jaroj), mencias ĝin kun sama sen-dubeco: la veran historion, oni devus diveni, se ĝi ne troviĝus en letero de la Sanitara tribunalo al la guberniestro, konservata en la arkivo de San Fedele: el kiu ni tiris ĝin, citante la vortojn, kiujn ni kursivigis¹⁷.

La morgaŭan matenon, nova, pli stranga kaj pli rimarkinda spektaklo frapis la okulojn kaj la intelektojn de la urbanoj. Ĉie en la urbo oni vidis dompordojn kaj murojn longa-space ŝmiritaj per ia malpuraĵo flaveta, blankaĉa, kvazaŭ frot-metita per spongoj. Ĉu tio okazis pro ies ventkapa intenco estigi timegon pli bruan kaj pli ĝeneralan, ĉu pro pli krima plano kreskigi publikan konfuzon, ĉu pro ajna alia motivo: la fakto estas tiamaniere atestita, ke al ni ŝajnus malpli logike taksu ĝin revaĵo de multaj ol faraĵo de kelkaj: kaj cetere

¹⁶ *redundanca*: superflua.

¹⁷ *kursivigis*: presigis per literoj kursivaj, t.e. oblikvaj.

faro tiuspeca estis nek unua nek lasta. Ripamonti, kiu ofte koncerne ŝmiradojn mokas, kaj pli ofte bedaŭras la popolan tro-kredemon, ĉi-koncerne asertas, ke li mem vidis tiun ŝmiraĵaĉon, kaj ĝin priskribas.¹⁸ En la supre citita letero la Sanitaraj sinjoroj rakontas la aferon per samaj terminoj; ili mencias vizitojn, eksperimentojn faritajn per tiu substanco sur hundoj, sen malbona efiko. Ili aldonas, ke laŭ ilia opinio *tia temerarajho devenas de petolemo pli ol de krima intenco*; penso kiu pruvas, ke estis en ili ĝis tiam sufiĉe da mensa klareco por ne vidi tion, kio fakte ne estas. Ceteraj samtempaj kronikoj, rakontante la aferon, mencias ankaŭ, ke komence multaj opiniis ke tio estas farita ŝerce, petole: sed neniu mencias eventualajn neantojn: kaj certe oni ilin mencias, se da ili estus: almenaŭ por ilin difini stranguloj. Mi taksis ne maloportune raporti kaj kunmeti tiujn ĉi detalojn, parte nemulte konatajn kaj parte tute ne konatajn, de fama deliro; ĉar ĉe la eraroj, ĉefe de popolamasoj, al mi ŝajnas plej utile kaj plej interese esplori ĝuste kiaj estis la vojo, kiun ili trairis, la ŝajnoj, la manieroj, laŭ kiuj ili povis eniri en la mensojn, kaj ilin ekregi.

La jam ekscitita urbo konsterniĝis: la dommastroj per flamanta pajlo bruletigis la ŝmiritajn spacojn: la pasantoj ekhaltis, rigardis, hororis, ekstremis. La popolo arestis en la stratoj kaj kondukis al la justicejo la fremdulojn, nur pro ilia

¹⁸ ... et nos quoque ivimus visere. Maculae erant sparsim inaequaliterque manantes, veluti si quis haustam spongiam saniem adpersisset, impressissetve parieti: et ianuae passim, ostiaque aedium eadem aspergine contaminata cernebantur. Paĝo 75 (N. d. A.). = ... kaj ankaŭ ni mem iris rigardi. Makuloj estis dismetitaj, malegalaj kaj likvaj, kvazaŭ oni estus ŝmirinta muron per spongo trempita en puso; kaj dise vidiĝis ankaŭ domaj pordegoj kaj pordoj sammaniere makulitaj.

fremdeco suspektitajn kaj tiam facile rekoneblajn el la vesto-
maniero. Oni demand-esploris kaj ekzamenis arestitojn,
arestintojn, atestantojn: oni trovis neniun kulpa: la mensoj
ankoraŭ kapablis dubi, ekzameni, kompreni. La Sanitara
tribunalo publikigis kriaĵon, per kiu ĝi promesis premion kaj
senpunecon al tiu, kiu klarigos la aŭtoron aŭ aŭtorojn de tiu
faro. *Chiel ajn, shajnante al ni malkonvene*, diras tiuj sinjoroj
en la citita letero datita je la 21-a de majo, sed verkita evidente
la 19-an, kiel notite sur la presita kriaĵo, *ke tiu chi krimo restu
iel ajn senpuna, precipe en nuna tiom danghera kaj
suspektinda tempo, por konsolo kaj trankviligo de tiu chi
popolo kaj por eltiri indicon pri fakto, ni publikigis hodiau
kriajhon* kaj t.p. En la teksto de la kriaĵo tamen, nenia
mencioto, almenaŭ klara, pri tiu racia kaj trankviliga
konjekto¹⁹, de ili komunikita al la guberniestro: silento, kiu
malkaŝas samtempe en la popolo furiozan antaŭjuĝon, kaj en
ili cedemon des pli mallaŭdindan ju pli ĝi povis esti ruiniga.

Dum la tribunalo serĉadis, multaj en la publiko – kiel
kutime okazas – jam trovis. El la kredantaj tiun ŝmiradon
veneniga, iuj kredis ke temas pri venĝo de Don Gonzalo
Fernandez de Cordova pro la insultoj ricevataj ĉe l' foriro, aliaj
artifiko de kardinalo de Richelieu por senhomigi Milanon kaj
konkeri ĝin senpene; aliaj, oni ne scias kial, kulpigis Grafon
de Collalto, Wallenstein-on, tiun aŭ alian milanan nobelon. Ne
mankis, kiel mi diris, homoj taksantaj tiun fakton nur stulta
petolaĵo, kaj oni kulpigis pri ĝi studentojn, senjorojn, oficirojn
enuantajn je l' sieĝo de Casale. Kaj la konstato ke ne okazis
tuja infektado kaj ĝenerala mortado, kiel verŝajne oni timis,
kaŭzis, ke tiu unua timego momente kvietiĝis kaj la afero estis

¹⁹ ke temas pri petola ŝerco.

aŭ ŝajnis forgesita.

Iuj personoj cetere ankoraŭ ne estis konvinkitaj, ke pesto aktualas. Kaj ĉar tiel en la urbo kiel en la pestulejo kelkaj tamen resaniĝis «estis onidiro», (ĉiam estas kurioze ekkoni la lastajn argumentojn de teorio malpravigita per la evidento) «estis onidiro de popolacho kaj ankau de multe da partiemaj kuracistoj, ke ne temas pri vera pesto, ĉar chiuj mortus».²⁰ Por forigi ĉian dubon, la Sanitara tribunalo elpensis rimedon proporcian je l' bezono, por paroli al okuloj, laŭ la maniero, kiun la epoko povis konsili kaj sugesti. En unu el la pentekostaj festotagoj la urbanoj kutimis amasiĝi al la tombaro de sankta Gregoro, ekster la Orienta Pordego, preĝe por la tie entombigitaj mortintoj de l' antaŭa kontaĝo, kaj ĉiu, eluzante la devotecon por amuziĝi kaj spektaklumi, iris tien kiel eble plej feste vestita. Tiutage estis mortinta interalie tuta familio. Je l' horo de plej granda amasiĝo, inter kaleŝoj, rajdantoj kaj piedirantoj, laŭ ordono de l' Sanitara buroo oni veturigis al la supre menciita tombejo la nudajn kadavrojn de tiu familio sur ĉaro, por ke la popolo vidu en ili evidentan markon de l' pesto. Kriado el abomeno kaj teruro leviĝis ĉie, kie la ĉaro veturis: longa murmurado regis, kie ĝi estis veturinta; alia murmurado antaŭeniris. Oni pli multe kredis je la pesto. Cetere ĝi mem ĉiutage pli kaj pli kredigis sin; kaj certe tiu amasiĝo mem ne ete helpis al ties disvastigo.

Komence do, ne pesto, tute ne, tute neniel: malpermesite eĉ eldiri tiun vorton. Pli poste, pestaj febroj: oni akceptas la ideon ne-rekte, per adjektivo. Pli poste, ne vera pesto, tio estas, pesto, jes, sed iusence: ne ĝuste pesto, sed afero, por kiu oni ne kapablas trovi alian nomon. Fine, pesto sen dubo nek

²⁰ Tadino, paĝo 93 (N. d. A.).

kontraŭdiro; sed jam al ĝi gluiĝas alia ideo, pri venenigo kaj sorĉaĵo, kiu fuŝas kaj konfuzas la ideon esprimitan de la jam nun ne plu rifuzebla vorto.

Ne estas necese, mi kredas, esti fakulo pri historio de ideoj kaj vortoj, por vidi, ke multaj aliaj terminoj iris similan vojon. Dank' al la ĉielo ne multas la aferoj tiuspecaj, kaj tiom gravaj, kaj akirantaj evidentecon tiomkoste, kaj kun la ebleco ricevi tiajn akcesoraĵojn.²¹ Eblas tamen, ĉu en grandaj ĉu en etaj aferoj, grand-parte eviti vojon tiel longan kaj malrektan, aplikante metodon proponitan jam de longe: observi, aŭskulti, kompari, pensi antaŭ ol paroli.

Sed paroli, tiu ĉi sola ago, estas tiom pli facila ol ĉiuj ceteraj kune, ke ankaŭ ni mem, ni aludas nin, la homojn ĝenerale, estas iom kompatindaj.

²¹ *akcesoraĵoj*: la aldonaj ideoj, pri venenigo kaj sorĉado, akompanantaj la ĉef-ideon pri pesto.

XXXII

Ĉar pli kaj pli malfacilis plenumi la aktualajn bedaŭrindajn bezonojn, la 4-an de majo en la dekestra konsilio estis decidite peti helpon de la guberniestro. Kaj la 22-an du konsilianoj estis senditaj al la sieĝ-kampo, por al li priskribi la malfeliĉojn kaj mizerojn de l' urbo: elspezojn grandegaj, kasojn malplenaj, venontjarajn rentojn jam fordestinitaj, aktualajn impostojn nepagitaj pro l' ĝenerala malriĉeco el multe da kaŭzoj, ĉefe la militaj damaĝoj; por proponi al lia konsidero ke, laŭ seninterrompaj leĝoj kaj moroj, kaj laŭ speciala dekreto de reĝo Karlo la 5-a, la elspezoj pro pesto estu je kosto de la fisko: okaze de l' pesto de la 1576-a jaro la tiama guberniestro, markizo de Ayamonte, ne nur suspendis¹ ĉiujn impostojn ŝulditajn al la regna fisko, sed eĉ donacis al la urbo kvardek mil eskudojn el la menciita fisko; fine, por peti kvar aferojn: suspendi la impostojn, kiel oni faris tiuokaze; la fisko donu monon; la guberniestro sciigu la reĝon pri l' mizeroj de l' urbo kaj provinco; ke li evitu novajn kantonmentojn en la lando jam mizerigita de la antaŭaj. La guberniestro skribrespondis per kondolencoj kaj denovaj admonoj: ke li ja bedaŭras ne povi ĉeesti en la urbo, por apliki sian tutan zorgon por ties senpezigo; sed ke espereble la fervora zorgemo de tiuj senjoroj rimedos je ĉio; ke nun konvenas elspezi senŝpare kaj klopodi ĉion eblan. Koncerne la esprimitajn petojn, *proueeré en el mejor modo que el tiempo y necesidades presentes permitieren*.² Kaj sube, spiralaĵo³, kiu volus signifi Ambrogio

¹ *suspendis* = provizore sendevigis.

² *proueeré... permitieren*: hispane = dispozicios laŭ plej bona maniero, kiun situacio kaj aktualaj necesoj permesos.

³ *spiralaĵo*: nelegebla subskribo.

Spinola, same klara kiel liaj promesoj. Grand-kanceliero Ferrer al li skribis, ke tiun respondon legis la dekestroj, *con gran desconsuelo*⁴; okazis aliaj iroj-reiroj, petoj kaj respondoj; sed mi ne trovas ke oni atingis pli konkretajn konkludojn. Post iom da tempo, kulmine de la pesto, la guberniestro transdonis, per oficiala dekreto, sian aŭtoritaton al Ferrer mem, ĉar estis lia devo, kiel li skribis, zorgi pri l' milito. Tiu ĉi milito, estu ĉi tie dirite parenteze, kiu pereigis, krom la soldatoj, minimume unu milionon da homoj per kontaĝo tra Lombardujo, Venecio, Piemonto, Toskanujo kaj parte Romanjo; mizerigis, kiel ni vidis pli supre, la landojn, kie ĝi trapasis, vi imagu tiujn, kie ĝi okazis; post la konkero kaj kruelega disrabo de Mantova; finiĝis per ĝenerala agnosko de l' nova duko, por kies forpelo ĝi estis entreprenita. Oni tamen devas agnoski, ke li devis cedi al la duko de Savojo parton de Monferrato, kies rento estis dek kvin mil eskudoj, kaj al Ferrante duko de Guastalla aliajn teritoriojn, kies rento estis ses mil eskudoj; kaj ke, per alia aparta kaj tute sekreta traktato, la supredirita duko de Savojo cedis Pinerolon al Francujo: traktato plenumita iom poste, sub aliaj pretekstoj kaj per amaso da ruzaĵoj.

Samtempe kun tiu dispozicio, la dekestroj decidis alian: peti la kardinalon ĉefepiskopon rajtigi solenan procesion, portante tra la urbo la korpon de sankta Karlo.

La bonvirta prelato rifuzis pro multaj kialoj. Li ne ŝatis tian konfidon je arbitra⁵ rimedo, kaj li timis ke, se la dezirata

⁴ *con gran desconsuelo*: hispane = kun granda senkuraĝiĝo.

⁵ *arbitra*: laŭ la katolika doktrino devoteco povus esprimi fidon ke sanktulo (per sia preĝo al Dio) helpos, se Dio volas; sed ĝi povus esprimi arbitrecon, t.e. magian pensomanieron, laŭ kiu devoteco efikas per si mem, ne per graco de Dio.

efiko ne okazos, afero kiun li mem timis, tiu konfido ŝanĝiĝos al skandalo⁶. Eĉ pli multe li timis ke, *se ekzistas da tiaj ŝmiristoj*, la procesio havigos al ili tro facilan oportunon por krimado; *se ne ekzistas*, la amasiĝo de tiom da homoj nur estigus pluan disvastigon de la kontaĝo: *kio estas danĝero ege pli reala*⁷. Fakte la intertempe kvietigita suspekto pri ŝmiraĵoj nun revekiĝis pli ĝenerala kaj furioza ol antaŭe.

Oni vidis denove, aŭ ĉi-foje al oni ŝajnis vidi ŝmiritaj murojn, pordegojn de publikaj konstruaĵoj, dom-pordojn, pordo-frapilojn. La sciigoj pri tiaj malkovroj flugis de buŝ' al buŝo; kaj, kiel ĝenerale okazas ĉe ekscititaj animoj, aŭdo egalvaloris kiel vido. La animoj, pli kaj pli afliktitaj pro la aktualaj malfeliĉoj, agacitaj pro la senĉesa danĝero, pli volonte akceptis tiun kredaĵon: ĉar kolero aspiras al puno, kaj, kiel sagace rimarkis talentulo⁸ ĉi-teme, preferas kulpigi pri malbono homan malicon, kontraŭ kiu eblas venĝi, ol kaŭzon, kontraŭ kiu nur eblas rezignacio. Veneno rafinita, tuj-efika, tute penetrema: estis vortoj pli ol sufiĉaj por klarigi la furiozon kaj ĉiajn plej obskurajn kaj ĥaosajn akcidentojn de la morbo.

⁶ *Memorajhoj pri rimarkindaj okazintajhoj en Milano okaze de kontagha morbo en jaro 1630*, ktp. kolektitaj de D. Pio la Croce, Milano 1730. Evidente ĝi estas tiritita el neeldonita verko de aŭtoro vivinta epoke de la pesto: oni rajtas eĉ supozi, ke ĝi ne estas nova kompilaĵo, sed nur eldono de l' tiama verko (N.d.A.).

⁷ *Si unguenta scelerata et unctores in urbe essent... Si non essent... Certiusque adeo malum*. Ripamonti, paĝo 185 (N.d.A.). Latine = «Se krimaj ŝmiraĵoj kaj ŝmiristoj en la urbo estus... Se ne estus... Malbono tute pli certa».

⁸ *talentulo*: P. Verri, *Rimarkoj super la torturo: Italaj verkistoj pri ekonomiko*; moderna parto, volumo 17, paĝo 203 (N. d. A.). Temas pri Pietro Verri (1728-1797), klerista inteligentulo.

Oni diris, ke tiu veneno konsistas el bufoj, serpentoj, bavo⁹ kaj puso de pestuloj, kaj eĉ pli fie, el ĉio ajn, kion sovaĝaj kaj konsternitaj fantazioj kapablis elpensi hidega kaj kruelega. Oni al tio aldonis sorĉaĵojn, per kiuj ĉia efiko ebligis, ĉia objeto vaniĝas, ĉia malfacilo solviĝas. Ke la efikoj ne konstatiĝis tuj post tiu unua ŝmirado, estis kompreneble: temis pri misprovoj de ankoraŭ malspertaj venenistoj: sed nun la arto pli perfektigis, kaj la volo fariĝis pli obstinaj en sia infera intenco. Se nun iu asertus ke temas pri petolaĵo, se iu neus la ekziston de komploto, tiu estus opiniata blinda kaj obstina; se li eĉ ne suspektiĝus kiel interesulo deturni de la vero la atenton de la publiko, kiel komplico, kiel *ŝmiristo*: la termino baldaŭ fariĝis komuna, impona, terura. Ĉe tia komuna konvinko, ke ŝmiristoj certe ekzistas, oni devus da ili nepre malkovri: ĉies okuloj alarmiĝis; ĉia movo povis estigi suspekton. Kaj la suspekto facile fariĝis certeco, kaj la certeco furiozo.

Kiel pruvojn Ripamonti alportas du faktojn, avertante, ke li elektis ilin ne kiel plej kruelajn inter la ĉiutage okazantaj, sed ĉar bedaŭrinde estis li mem de ambaŭ atestanto.

Ian festan tagon, en la preĝejo de sankta Antono, maljunulo pli ol okdek-jara, preĝinte genue dum iom da tempo, volis sidiĝi; kaj antaŭ tio li per la mantelo senpolvigis la sidbenkon. «Tiu maljunulo ŝmiras la benkojn!» unuvoĉe kriis kelke da virinoj vidintaj tiun faron. La ĉeestantoj en la preĝejo (rimarku: en la preĝejo!), tuj atakis la oldulon; ili kaptas lin je la tute blankaj haroj; pugnobatas kaj piedfrapas; iuj lin tiras, aliaj lin puŝas eksteren; oni ne mort-batis lin, nur por lin trenaĉi, tiel duonvivan, al karcero, al juĝistoj, al

⁹ bavo: ŝaŭma salivo.

torturoj. «Mi vidis lin, dum oni lin tiele trenaĉis», skribas Ripamonti: «kaj mi eksciis nenion pluan: mi ja kredas ke li ne sukcesis plu vivi pli ol kelke da momentoj».

La dua fakto (okazinta la morgaŭan tagon) estis same stranga, sed ne tiel fatala. Tri francaj junuloj, literatoro, pentristo kaj meĥanikisto, kune veninte viziti Italujon, por studi ties antikvaĵojn kaj serĉi oportunon por gajno, proksimiĝis al ekstera flanko de la Milana katedralo kaj tie rigardis atente. Pasanto ilin vidas kaj haltas: li gest-indikas ilin al alia, al pluaj alvenantoj: grupiĝis hom-rondo, rigardante, observante tiujn homojn, kiujn vesto-maniero, har-aranĝo kaj dusakoj pruvis esti fremdaj kaj, eĉ pli aĉe, francaj¹⁰. Tiuj fremduloj, kvazaŭ por certiĝi, ke temas pri vera marmoro, etendis la manon por tuŝi. Tio sufiĉis. Ilin oni ĉirkaŭis, kaptis, batis, puŝaĉis en malliberejon. Bonŝance la juĝejo ne malproksimas de la katedralo, kaj, eĉ pli bonŝance, oni trovis ilin senkulpaj kaj liberigis.

Kaj da tiaĵoj okazis ne nur en la urbo: la frenezo disvastiĝis same kiel la kontaĝo. Vojaĝanton, kiun eventuale kamparanoj renkontis ekster ĉef-vojo, aŭ kiu eĉ sur ĝi haltetis por dis-rigardi, aŭ kiu sin ĵetis teren, por ripozi; nekonatojn, en kies vizaĝo aŭ vestaĵo oni trovis ion stranga, suspektinda, oni taksis certe ŝmiristoj. Ĉe ies ajn averteto, ĉe l' krio de knabo, oni sonorilumis alarme, oni alkuris: la malfeliĉulojn oni ŝtonfrapadis aŭ kaptis kaj kondukis popolamase en malliberejon. Tion rakontas la sama Ripamonti. Kaj la malliberejo estis foje savo-dona haveno.

Sed la dekestroj, ne senkuraĝigite per la rifuzo de l' saĝa

¹⁰ *francaj*: kaj do politike malamikoj de Hispanujo, sub kies regado kuŝis Milano.

prelato, pliigis siajn insistojn, kiujn la popolo brue favoris. Federigo kontraŭstaris ankoraŭ iomtempe, klopodis ilin konvinki: nur tiom povis la saĝo de unuopulo kontraŭ la forto de la epoko kaj la insiston de multaj. Ĉe tia stato de l' opinioj, kun ideo pri danĝero, kiu estis tiutempe tiel konfuza kaj kontraŭata, tute for de la nuntempa evidento, facile kompreneblas, kiel eĉ en lia menso alies mis-rezonoj submetis liajn pravajn rezonojn. Ĉu lian cedon iom influis ia nefirmeco de lia volo, tio apartenas al la misteroj de l' homa koro. Certe, se iam ajn oni rajtas kulpigi pri eraro la intelekton, sed ne la konsciencon, tio koncernas la malmultajn (inter kiuj certe Federigon), kies tuta vivo pruvas rezolutan obeon al la konscienco, sen konsidero pri surteraj interesoj. Post ripetaj petoj, li do cedis, konsentis efektivigon de la procesio, konsentis ankaŭ la deziregon, la publikan insiston, ke la ĉerko enhavanta la relikvojn de sankta Karlo, restu elmetita dum unu semajno sur la katedrala ĉef-altaro.

Mi ne trovas, ke la sanitara tribunalo aŭ aliaj faris ajnan proteston aŭ opozicion. Nur tio: la supre dirita tribunalo ordonis antaŭzorgojn, kiuj, ne evitante la danĝeron, tamen montris pri ĝi timon. Ĝi preskribis pli severajn regulojn pri eniro de personoj en la urbon; kaj por garanti ilian plenumon, ĝi ordonis ke la pordegoj restu fermitaj; kaj krome, por laŭeble ekskluzivi el la amasiĝo la pestulojn kaj la suspektindajn, ĝi ordonis najlo-fermi la pordojn de l' domoj trud-izolitaj: tiaj domoj, se kredi kronikiston tiuepokan kaj en tia situacio, estis ĉirkaŭ kvincent.

La preparo daŭris tri tagojn: en la fiksita tago, nome dekunua de junio, la procesio eliris de la katedralo ĉe l' tagiĝo. Antaŭiris longa amaso da popolo, plejparte virinoj kun la

vizaĝoj kovritaj per larĝaj vualoj, multaj nudpiedaj kaj vestitaj per sakaĵo. Poste venis la korporacioj, ĉiu sekve al sia standardo, la frataroj en diversformaj kaj diverskoloraj roboj, poste monakaroj, poste pastraro, ĉiu kun la insignoj de sia rango, kaj kun kandelo aŭ torĉeto enmane. Meze, tra l' brilo de pli densaj lumiloj, tra pli laŭta bruo de ĉantoj, sub riĉa baldakeno, iris la ĉerko,¹¹ ŝultre portata de po kvar kanonikoj, pompege vestitaj, kiuj alternis de temp' al tempo. Tra la kristaloj vidiĝis la respektigata kadavro vestita per riĉaj episkopaj ornattoj, kaj kun mitro¹² surkranie: en la stumpaj kaj malkunigitaj formoj, oni povis ankoraŭ distingi trajtojn de l' iama aspekto, kia ĝin prezentis bildoj, kaj kia ĝin memoris iuj vidintaj lin viva. Malantaŭ la kadavro de l' mortinta paŝtisto (diras Ripamonti, el kiu precipe ni ĉerpas tiun ĉi priskribon), kaj al li tute proksime paŝis ĉefepiskopo Federigo, same proksima al li laŭ merito, parenceco kaj rango. Sekvis la cetera pastraro, poste urbestro en plej solenaj vestaĵoj; pli poste nobeloj, iuj luksege vestite, kvazaŭ por solena elmontrado de kulto, aliaj, pentofare, funebre vestite, aŭ nudpiedaj, aŭ mantel-kovritaj, kun tutvizaĝa kapuĉo; ĉiuj kun torĉetoj. Fine, longa vico de alia diversa popolamaso.

La tuta vojo estis feste ornamita: riĉuloj estis elmetintaj siajn plej valorajn garnaĵojn; fasadoj de malriĉaj domoj estis ornamitaj fare de riĉo-havaj najbaroj aŭ je publikaj elspeztoj; frondo-riĉaj branĉoj pendis jen anstataŭ ornamaĵoj, jen sur la ornamaĵoj mem; ĉie pendis bildoj, skribaĵoj, ŝildoj; sur fenestro-bretoj elmontriĝis vazoj, antikvaĵoj, diversaj raraĵoj; ĉie lumiloj. El multe da tiuj fenestroj, trud-izolitaj malsanuloj

¹¹ *ĉerko*: kesto por enmeti korpon de mortinto.

¹² *mitro*: altpinta kapvesto de episkopoj.

rigardis la procesion kaj akompanis ĝin per preĝoj. La ceteraj stratoj estis mutaj kaj senhomaj; sed iuj el fenestroj streĉis la orelojn al tiu vaganta zumado; aliaj, inter kiuj vidiĝis eĉ monakinoj, supren-grimpis tegmentojn por laŭeble vidi de malproksime tiun ĉerkon, ties sekvantaron, ion ajn.

La procesio pasis tra ĉiuj urbo-kvartaloj: ĉe ĉiu vojkruciĝo aŭ placeto, kie la ĉefaj stratoj eniras en la kvartalojn, kaj kiuj tiam ankoraŭ havis la antikvan nomon *carrobi*-oj, nuntempe gardatan de nur unu el ili, oni haltis, demetante la ĉerkon apud la kruco, starigita en ĉiu el ili fare de sankta Karlo mem, okaze de la antaŭa pesto, kaj el kiuj kelke ankoraŭ staras. Tial oni revenis katedralen longe post tagmezo.

Kaj jen, la postan tagon, ĝuste dum regis tiu tro-fidemo, kaj en multaj eĉ fanatika sekureco, ke la procesio nepre devas esti ĉesigiginta la peston, la mortoj male plimultiĝis, en ĉiu socia klaso, en ĉiuj urbo-partoj, tiel abunde kaj tiel subite, ke ĉiuj nepre vidis ties kaŭzon aŭ okazigon en la procesio mem. Sed, ho mirinda kaj bedaŭrinda forto de ĝenerala antaŭjuĝo! la plejmulto kulpigis pri tio tute ne tiel longan kunestadon de tia homamaso, tute ne tian multobliĝon de hazardaj kontaktoj; sed ja tion, ke la ŝmiristoj povis pli facile plenumi sian fian planon. Oni diris ke, meze de l' popolamaso, ili infektis per sia ŝmiraĵo kiel eble plej multajn. Sed ĉar tio ne ŝajnis rimedo sufiĉa nek taŭga por klarigi mortadon tiel vastan, kaj de tiel divers-klasaj personoj; kaj ĉar la okulo tiel atenta kaj akrevida de l' suspekto ne sukcesis malkovri ajnan ŝmiraĵon aŭ makulon sur muroj nek aliloke; tial oni sin turnis, por klarigi la fakton, al tiu alia artifiko, tiam jam malnova kaj akceptita de la komuna scienco de Eŭropo, pri sorĉaj venenaj pulvoroj; oni diris ke tiaj pulvoroj, ŝutite surstrate, kaj precipe en la halt-

lokoj de la procesio, algluiĝis al vesto-trenaĵoj, kaj des pli al la piedoj tiutage multnombre senŝuaj. «Vidis do», diras tiama historiisto,¹³ «tiu sama tago de procesio piecon konflikti kontraŭ malico, perfidon kontraŭ sincereco, gajnon kontraŭ malgajno». Sed fakte temis nur pri la povra homa misprudento, kiu konfliktis kontraŭ l' fantomoj de ĝi mem kreitaj.

De post tiu tago la furiozo de l' kontaĝo pliiĝis konstante: en nelonga tempo, preskaŭ ne troviĝis netuŝita domo. En nelonga tempo la lazaretanoj, laŭ la citita Somaglia, plimultiĝis de du ĝis dekdu mil: pli poste, laŭ preskaŭ ĉiuj historiistoj, ilia nombro atingis dek ses mil. La 4-an de julio, kiel mi trovas en alia letero de la Sanitaraj Konservistoj al la guberniestro, la ĉiutaga mortado superis kvincenton. Pli poste, kaj kulmine, laŭ plej komuna kalkul-konjekto, ĝi atingis ĝis mil ducent, mil kvincent; eĉ tri mil kvincent, se kredi Tadinon. Ĉi-lastas asertas ankaŭ, ke, «lau esploroj plenumitaj» post la pesto, la Milana loĝantaro malaltiĝis al nemulte pli ol sesdek kvar mil animoj, dum antaŭe ĝi estis super ducent kvindek mil. Laŭ Ripamonti, ĝi konsistis nur el ducent mil homoj: da mortintoj, li diras ke en la urbaj registroj estis enskribitaj cent kvardek mil, krom tiuj, kiujn ne eblis enkalkuli. Aliaj diras pli aŭ malplie, sed eĉ pli hazardaĉe.

Oni imagu nun, kiel stataĉis la dekestroj, sur kiuj restis la peza tasko respondi al la publikaj bezonoj, ripari tion kio estis riparebla en tia katastrofo. Necesis ĉiutage anstataŭigi, ĉiutage plimultiigi diversa-specajn publikajn servantojn: *monatiojn*, *avertistojn*, komisarojn. La unuaj estis destinitaj al la plej

¹³ Agostino Lampugnano, *Pestepidemia okazinta en Milano en jaro 1630*. Milano, 1634, paĝ. 44 (N.d.A.).

penigaj kaj danĝeraj servoj ĉe l' pesto: forpreni el la domoj, el la stratoj, el la pestulejo kadavrojn; ilin per ĉaroj veturigi al fosaĵoj kaj enterigi; alporti aŭ konduki al pestulejo la malsanulojn kaj ilin regi; bruligi aŭ purigi ĉion infektan aŭ suspektan. La nomo, laŭ Ripamonti, devenas el la greka vorto *monos*; laŭ Gasparo Bugatti (en priskribo de la antaŭa pesto), el la latina verbo *monere*; sed samtempe li sin demandas, pli prave, ĉu ĝi estas germana vorto, ĉar tiuj viroj estis varbitaj plejparte en Svisujo kaj Grizono.¹⁴ Fakte ne estus absurde taksu ĝin stumpaĵo de l' germana vorto *monathlich* (monata) ĉar, pro malcerteco pri l' daŭro de l' bezono, eble oni ilin varbis per monata dungo. Speciala tasko de la avertistoj estis antaŭiri la ĉarojn, por averti per tintilo la pasantojn, ke ili foriĝu. La komisaroj estris monatiojn kaj avertistojn, sub senpera aŭtoritato de l' Sanitara tribunalo. La pestulejo bezonis daŭran provizadon de kuracistoj, kirurgoj, kuraciloj, proviantoj, kaj ĉiuspecaj malsanulejaj ekipaĵoj. Necesus trovi kaj pretigi novajn loĝlokojn por gastigi la malsanulojn, kiuj ĉiutage aldoniĝis. Oni rapide konstruigis tiucele kabanojn el ligno kaj pajlo en la interna spaco de l' pestulejo. Oni starigis ankaŭ novan lazareton tute el kabanoj ĉirkaŭitan per simpla ligno-barilo, taŭgan enteni kvarmil personojn. Kaj ĉar tiu ĉi ne sufiĉis, oni dekretis du aliajn: oni eĉ komencis ties konstruon; sed, pro manko de ĉiuspecaj rimedoj, ili restis stumpaj. Malpliigis rimedoj, personoj, kuraĝo, laŭgrade ke pli multiĝis la bezonoj.

Kaj ne nur oni ĉiufoje plenumis malpli ol planite kaj ordonite; ne nur pri multe da necesoj, eĉ tute agnoskitaj, oni

¹⁴ *Grizono*: tiuepoke teritorio de Germanujo, nuntempe kantono de Svislando.

malsufiĉe zorgis eĉ parole; oni atingis tian ekstremon de senpoveco kaj malespero, ke al multe da bezonoj, eĉ plej kompatindaj kaj urĝaj, oni tute nenian rimedon aplikis. Ekzemple, mortadis forlasite granda kvanto da infanoj de patrinoj mortintaj pro pesto; la Sanitara tribunalo proponis establi gast-loĝejon por ili, kaj por malriĉaj akuŝantinoj; kaj iel zorgi por ili; sed ĝi nenion povis efektiviĝi. «Oni devis tamen», skribas Tadino, «kompati Dekestrojn en Urbo, kiujn chagrenis kaj deprimis kaj turmentis senregula kaj senrespekta Soldataro; kaj des pli en malfelicha Duklando, konsidere ke nenia helpo nek provizo haveblis de Guberniestro, ĉar estis milit-tempo kaj estis necese bone provizi Soldataron».¹⁵ Tiom gravis konkeri Casale-n! Tiom grandioze aspektas la gloro pro milit-venko, ne konsidere la motivon aŭ celon de la milito mem!

Tiel same, ĉar plenis de kadavroj la vasta sed ununura kavego fosita apud la pestulejo; kaj restis ne nur tie ĉi, sed ankaŭ dise tra la tuta urbo ne sepultite la kadavroj, kiuj ĉiutage pli kaj pli multis, la magistrato, vane serĉinte brakojn por tiu abomeninda laboro, reduktiĝis al tio, ke ĝi deklaris ne plu scii kion dispozicii. Kaj ne videblis kiel la afero finiĝos, se ne venus eksterordinara helpo. La Sanitara prezidanto sin turnis, tute malespere kaj ploure, al la du bravaj kapucenoj, kiuj mastrumis la pestulejon: kaj patro Michele garantiis al li la forigon de ĉiuj kadavroj el la urbo, limtempe de kvar tagoj, kaj la fosigon, lime de ok tagoj, de fosaĵoj sufiĉaj ne nur por la nunaj bezonoj, sed eĉ por kiom eble plej aĉe oni povus prognozi estontece. Kune kun alia kapuceno kaj kun tribunaloj, kiujn al li havigis la prezidanto, li iris serĉi

¹⁵ Paĝo 117 (N.d.A.).

kampulojn ekster la urbo; kaj parte per la aŭtoritato de l' tribunalo, parte per tiu de sia monaka robo kaj sia parolo, li kolektis ĉirkaŭ ducent homojn, al kiuj li ordonis fosi tri grandegajn fosaĵojn. Poste li sendis pestulejajn monatiojn, por kolekti kadavrojn; tiel ke, en la fiksita tago, lia promeso estis plenumita.

Iam la pestulejo restis sen kuracistoj: kaj oni sukcesis trovi da ili nur pene kaj malfrue, per promeso de grandaj honorarioj kaj honoroj; sed ege malpli multe ol bezonate. Ofte oni riskis resti tute sen proviantoj; tiel ke oni timis morti eĉ pro malsato; kaj pli ol unufoje, kiam oni ne sciis kion elpensi por trovi necesajn vivrimedojn, alvenis ĝustatempe abundaj helpaĵoj, el neatenditaj donacoj de privata mizerikordo: ĉar, en la ĝenerala konsterno, kaj en la indiferenteco pri aliuloj, kiun kaŭzis la daŭra timo pri si mem, estis animoj daŭre karitat-viglaĵ; en aliaj la karitato naskiĝis ĉe l' ĉeso de ĉia sur-tera ĝojo. Ja mortis kaj eskapis multaj havantaj la taskon estri kaj provizi, sed iuj korpe sanaj kaj kuraĝe firmaj restis ĉe sia posteno; kaj eĉ estis aliaj, kiuj, instigite de kompato, surprenis kaj bonvirte eltenis zorgojn, al kiuj ili ne estis devigitaj ofice.

La homklaso, en kiu plej brile distingiĝis ĝenerala kaj dispona kaj konstanta fideleco al la malfacilaj aktualaj devoj, estis la ekleziularo. Ĉe la pestulejoj kaj tra la urbo, neniam mankis ilia asistado: kie oni suferis, tie da ili ĉeestis; ĉiam oni vidis ilin kunmiksitaĵ, konfuzitaĵ kun langvoraj, kun mortantaj homoj, foje ankaŭ ili mem mortantaj kaj langvoraj; al la spiritaĵ helpoj ili laŭeble aldonis korpajn; ili plenumis ĉian servon, kiun cirkonstancoj postulis. Pli ol sesdek parokestroj, nur en la urbo, mortis pro kontaĝo: proksimume ok naŭonoj.

Federigo kiel atendeble donis al ĉiuj instigon kaj

ekzemplon. Malgraŭ la formorto de l' preskaŭ tuta ĉefepiskopa servistaro, kaj la insistoj de parencoj, altaj magistratanoj, najbaraj princoj, ke li eskapu for de l' danĝero, rifuĝante en vilaon, li malakceptis tian konsilon kaj rezistis al la insistoj kun tiu sama spirito, kun kiu li skribis al la parokestroj: «estu pretaj forlasi tiun ĉi mortontan vivon, prefere ol ĉi tiun familion, ĉi niajn gefilojn: vi iru amoplene renkonte al la pesto, kiel al premio, kiel al vivo, kiam temas pri akiro de unu animo al Kristo». Li ne neglektis antaŭzorgojn, kiam ĉi-lastaj ne lin malhelpis plenumi sian devon (pri tio li eĉ verkis instrukciojn kaj regulojn por la pastraro); kaj samtempe li maltimis la danĝeron kaj sani ke li eĉ ne ekrimarkas ĝin, kiam, por bonfari, necesis ĝin trairi. Se ne paroli pri la ekleziuloj, kiujn li senĉese vizitis, ĉu por laŭdi kaj gvidi ilian fervoron, ĉu por eksciti tiujn, kies laboro estis senfervora, ĉu por iujn sendi al postenoj, kie aliaj mortis, li dispoziciis, ke lia domo estu malfermita por ĉiuj, kiuj eventuale bezonas lin. Li vizitis pestulejojn, por konsoli malsanulojn kaj por kuraĝigi helpantojn; trairis la urbon, portante helpojn al malfeliĉaj enfermitoj hejme; haltante ĉe la pordoj, sub la fenestroj, por aŭskulti iliajn lamentojn, kaj respondi per konsolaj kaj kuraĝigaj vortoj. Unuvorte, li sin enĵetis kaj travivis la tutan peston, fine mirigite li mem, ke li elsaviĝis.

Tiele, ĉe l' publika malfeliĉego kaj perturbado de ĉia ordinara viv-ordo, oni ĉiam konstatas kreskon kaj sublimiĝon de virtoj; sed, bedaŭrinde neniam mankas samtempa kresko, kutime eĉ pli vasta, de perversaĵoj. Kaj ankaŭ ĉi tion oni rimarkis. La friponegoj, kiujn la pesto indulgis kaj ne teruris, trovis en la komuna konfuzego, en la malpliigo de ĉia publika

forto, novan oportunon por malbonfari, kaj samtempe novan garantion pri senpuneco. Eĉ la apliko de la publika forto venis grandparte en la manojn de l' plej fiaj el ili. Por roli kiel monatioj kaj avertistoj, kutime akceptis dungiĝon nur homoj, kiujn allogo je rabado kaj senbrideco regis pli ol timo pri kontaĝo, pli ol ĉia natura naŭzo. Por ili estis ja preskribitaj plej rigoraj reguloj, minacitaj severegaj punoj, fiksitaj postenoj; super ili oni metis komisarojn kiel estrojn, kiel ni jam diris; super ambaŭ kategorioj estis delegitaj en ĉiu kvartalo magistratanoj kaj nobeloj, rajtigitaj dispozicii sen formalaĵoj ĉion bezonatan por bona regado. Tia sistemo funkciis kaj efikis dum iom da tempo; sed, ĉar ĉiutage kreskis la nombro da homoj, kiuj mortis, kiuj foriris, kiuj freneziĝis, rezultis ke tiuj fiuloj ne plu havis bridantojn: kaj ĉefe la monatioj fariĝis despotoj de ĉio. Ili eniris kiel mastroj, kiel malamikoj, en la domojn kaj, krom raboj kaj mistraktoj kontraŭ la malfeliĉuloj, kiujn la pesto devigis pasi tra tiaj manoj, tiujn infektitajn kaj krimajn manojn ili metis sur sanuloj, gefiloj, parencoj, edzinoj, edzoj, minacante trenaĉi ilin en pestulejon, se ili ne elaĉetus sin, aŭ ne elaĉetiĝus kontraŭ mono. Alifoje ili postulis prezon por siaj servoj, rifuzante forporti jam putrajn kadavrojn, se ili ne ricevus certan kvanton da eskudoj. Oni diris (kaj inter leĝereco de unuj kaj kanajleco¹⁶ de aliaj, estas egalriske kredi kaj malkredi) oni diris, kaj eĉ Tadino tion deklaras, ke monatioj kaj avertistoj intence faligis el la ĉaroj infektitajn vestaĵojn por disvastigi kaj daŭrigi la peston, kiu fariĝis por ili gajno-fonto, reĝado, festado. Aliaj fiuloj, ŝajnigante sin monatioj, kun tintilo ligita je piedo, kiel estis al

¹⁶ *leĝereco...kanajleco*: naiveco de kronikistoj kaj friponeco de monatioj.

monatioj preskribite, kiel distingilo kaj avertilo ke ili proksimiĝas, eniris domojn por tie fari ĉiuspecajn fiaĵojn. En iujn hejmojn, malfermitajn kaj senhomajn, aŭ loĝatajn nur de kelka langvorulo, de kelka mortanto, ŝtelistoj eniris por senpune rabadi; aliajn domojn konkeris kaj okupis la sbiroj, kiuj faris la samon aŭ eĉ pli fie.

Kune kun perverseco, kreskis ankaŭ frenezo: ĉiuj pli-malpli regantaj miskonceptoj ĉerpis el tiamaj konsternego kaj ekscitiĝo eksterordinaran forton, kaj estigis pli rapidajn kaj vastajn efikojn. Kaj ĉiuj tiuj miskonceptoj kunhelpis plifortigi kaj pligrandigi tiun specialan timon pri ŝmiroj, kiu per siaj efikoj kaj eksplodoj estis ofte, kiel ni jam vidis, alia perversaĵo. La imago pri tiu supozata danĝero obsedis kaj torturis la animojn, multe pli ol la fakta kaj aktuala danĝero. «Kaj dum la kadavroj», skribas Ripamonti, «aŭ disaj aŭ amasigitaj, daŭre antaŭ la okuloj, daŭre ĉe la piedoj, igis la tutan urbon ununura funebraĵo, jen io eĉ pli fia, pli fatala en tiu reciproka furiozo, en tiu senbrida kaj monstra suspektado... Ne nur oni suspektis najbaron, amikon, gaston: sed tiuj nomoj, tiuj ligiloj de l' homa am-sento: edzo kaj edzino, patro kaj filo, frato kaj frato, kaŭzis teruron; kaj, afero abomena kaj hontinda por diri! eĉ la familial manĝo-tablon, la geedzan liton oni timis kvazaŭ embuskon aŭ kaŝejon de venenado».

La imago pri la vasteco kaj strangeco de l' komploto perturbis ĉian prudenton, fuŝis ĉian motivon de reciproka fideo. Komence oni kredis, ke tiujn supozajn ŝmiristojn instigas ambicio aŭ profiteco; pli poste, oni fantaziis, oni kredis, ke sub-estas ia diabla volupto, allogo reganta la volon. La deliraĵoj de l' malsanuloj, kiuj kulpigis sin mem pri tio, kion ili timintis ĉe aliuloj, rolis kvazaŭ riveloj, kaj igis ĉian

aferon kredinda al ĉiuj. Kaj pli ol vortoj, verŝajne impresis la elmontroj, se okazis, ke deliraj pestuloj faradis tiujn gestojn, kiujn ili imagis farataj de ŝmiristoj: afero verŝajna kaj samtempe taŭga por tute pravigi la ĝeneralan konvinkon kaj la deklarojn de multe da historiistoj. Tiel, dum la longa kaj bedaŭrinda epoko de l' procesoj pro sorĉado, la konfesoj de l' kulpigitoj, ne ĉiam eldevigitaj perforte, ne ete kontribuis disvastigi kaj daŭrigi la regantan opinion pri sorĉadoj: ĉar, kiam opinio regas longtempe kaj en vasta parto de l' mondo, ĝi fine sin esprimas ĉiumaniere, elprovas ĉiujn elir-vojojn, okupas ĉiujn gradojn de konvinko; kaj, se ĉiuj aŭ plejmultaj longtempe kredas ion farata, preskaŭ certe venos homo, kiu kredos fari li mem la samon.

Inter la historietoj, kiujn naskis tiu delirado pri ŝmiraĵoj, unu estas menciinda, pro sia famo kaj disvastiĝo. Oni rakontis, ne ĉiuj egalmaniere (tio estus tro escepta privilegio de l' fabeloj), sed sufiĉe simile, ke ia homo, iun tagon, vidis alveturi al la katedrala placo ses-ĉevalan veturilon, sur kiu veturis, krom aliaj, grava moŝtulo kun sombra kaj fajra vizaĝo, flamaj okuloj, hirtaj haroj, kaj lipo minacema. Dum la vidanto atente rigardis, la veturilo haltis, kaj la koĉero lin invitis supreniri; kaj li ne kapablis rifuzi. Post pluraj rond-veturoj, ili elkaleŝiĝis ĉe l' pordo de iu palaco, kie li, enirinte kun la tuta societo, trovis agrablaĵojn kaj teruraĵojn, dezertojn kaj ĝardenojn, kavernojn kaj salonojn; kaj tie, inaj fantomoj kunsidis interkonsiliĝe. Fine estis al li montritaj grandaj kasoĵ plenaj de mono kaj li estis invitita elpreni da ĝi laŭplaĉe, kondiĉe tamen ke li akceptu vazeton da ŝmiraĵo, por ŝmiradi tra la urbo. Sed, ĉar li ne konsentis, li subite troviĝis en la sama loko, kie li estis kaptita. Ĉi tiu historieto, ĉe ni ĝenerale kredita de l'

popolo, kaj, laŭ Ripamonti, ne-sufiĉe mokata de gravuloj, rondiris tra tuta Italujo kaj eksterlande. En Germanujo oni faris pri ĝi gravuraĵon; la princo-elektisto ĉefepiskopo de Mainz skribis al kardinalo Federigo, por demandi, kion kredi pri la mirindaj okazaĵoj rakontataj pri Milano; kaj li ricevis respondon, ke temas pri fantaziaĵoj.

Egal-valoraj, se ne tute egalaj, estis la revoj de l' kleruloj; kaj same katastrofaj estis ties efikoj. Plejmultaj el ili vidis anoncon kaj samtempe kaŭzon de l' malfeliĉoj en kometo aperinta la jaron 1628-an, kaj en la konjunkcio de Saturno kun Jupitero «klinighante», skribas Tadino, «menciita konjunkcio super tiu chi jaro 1630-a tiel klare, ke chiu ajn povis ghin percepti. *Mortales parat morbos, miranda videntur*»¹⁷. Tiu ĉi prognozo, ĉerpita, oni diris, el libro titolita: *Spegulo de perfektaj almanakoj*, presita en Torino en 1623, trakuris ĉies buŝojn. Alian kometon, aperintan junie de l' sama jaro de la pesto, oni konsideris kiel denovan averton kaj eĉ kiel klaran pruvon pri ŝmiradoj. Oni esploris librojn, kaj bedaŭrinde oni trovis grandan kvanton da ekzemploj de pesto laŭdire manfarita: oni citis Livion, Taciton, Dionon, kion diri? eĉ Homeron kaj Ovidion, kaj la multajn aliajn antikvulojn, kiuj rakontis aŭ menciis similajn faktojn: da modernuloj, oni havis eĉ pli abunde. Oni citis cent aliajn aŭtorojn, kiuj pritraktis doktrine aŭ menciis preterpase venenojn, magiaĵojn, ŝmiraĵojn, pulvorojn: temis pri Cesalpino¹⁸, Cardano, Grevino, Salio, Pareo, Schenchio, Zachia kaj fine tiu fatala Delrio, kiu, se l' famo de l' aŭtoroj estus proporcia kun bono aŭ malbono kaŭzita per iliaj verkoj, devus esti unu el la plej famaj; tiu

¹⁷ Latine = Mortigajn pretigas morbojn, mirindaĵoj aperas.

¹⁸ *Cesalpino* ktp.: tiamaj sciencistoj.

Delrio, kies maldormoj¹⁹ kostis pli da mortoj ol la ekspedicioj de iuj konkerantoj; tiu Delrio, kies *Magiaj Disertacioj* (koncentraĵo de ĉio, kion la homoj estis ĝis tiam revintaj pri tiu fako), fariĝis la teksto plej aŭtoritata, plej ne-atakebla, kaj estis, dum pli ol unu jarcento, normo kaj potenca impulso por laŭ-leĝaj, hororaj, seninterrompaj amas-buĉadoj.

El la elpenaĵoj de l' popolaĉo la kleruloj ĉerpis tion, kio povis akordiĝi kun iliaj ideoj; el la elpenaĵoj de l' kleruloj la popolo ĉerpis tion, kion kaj kian ĝi kompreni povis: kaj el ĉio formiĝis grandega kaj konfuza amaso de publika frenezaĵo.

Sed tio, kio plej multe mirigas, estas vidi la medicinistojn, mi diras tiujn samajn medicinistojn, kiuj ek de l' komenco kredis je l' pesto, speciale mi diras Tadinon, kiu ĝin prognozis, vidis ties ekeston, observis, tiel dire, ties progreson, kiu estis dirinta kaj proklaminta, ke temas pri pesto, kiu disvastiĝas per kontakto, kaj ke, se oni ne aplikos rimedojn, la tuta lando certe infektiĝos; vidi lin pli poste, el tiuj samaj efikoj tiri pruvan argumenton pri venenaj kaj sorĉaj ŝmiradoj: lin, kiu en tiu Carlo Colonna, la dua pest-mortinto en Milano, estis rimarkinta deliron kiel flankan efikon de l' pesto, vidi lin pli poste, por pruvi ŝmiradojn kaj diablan komploton, menciis jenan fakton: du atestantoj depoziciis ke ili aŭdis iun malsanan amikon rakonti, ke ian nokton venis homoj en lian ĉambron, proponante al li resaniĝon kaj monon, se li volus ŝmiradi la najbarajn domojn; kaj ke ĉe lia rifuzo ili foriris, kaj restis anstataŭe lupoj sub la lito kaj tri gigantaj katoj sur ĝi, «kiuj ghis tagigho tie restadis».

Se nur unu homo rezonus tiel ĉi, oni devus diri, ke li havis kuriozan kapon; aŭ eĉ tute ne gravus paroli pri li; sed, ĉar estis

¹⁹ *maldormoj*: por komponi verkojn, kiuj kaŭzis katastrofojn.

multaj, eĉ preskaŭ ĉiuj, tial la fakto apartenas al la historio de la homa spirito kaj donas la oportunon rimarki, kiel bonordan kaj racian idearon povas renversi aliaj, malaj ideoj. Cetere, tiu Tadino estis ĉi tie²⁰ unu el la homoj plej estimataj de sia epoko.

Du famkonataj kaj meritaj verkistoj asertis, ke kardinalo Federigo dubis pri faktaj ŝmiradoj. Ni emus havi la eblecon doni al ties noblega kaj aminda memoro eĉ pli kompletan laŭdon, kaj prezenti la bonvirtan prelaton super la plimulto de liaj samtempuloj ankaŭ ĉi-koncerne, kiel en tiom da aliaj aferoj; male ni estas devigataj denove rimarki en li ekzemplon pri la reg-povo de komuna opinio eĉ super plej noblaj mensoj. Oni vidis, almenaŭ laŭ la asertoj de Ripamonti, ke je l' komenco li vere dubis: ankaŭ pli poste li daŭre taksis, ke en tia opinio grandan rolon ludas tro-kredemo, malklereco, timo, emo senkulpiĝi, ke oni tiel malfrue agnoskis la kontaĝon kaj disponigis rimedojn; entute ke oni multe troigis, sed samtempe io veras. En la Milana Ambroza Biblioteko oni konservas verketon mane skribitan de li mem, koncerne tiun peston; kaj tia opinio estas plurfoje aludita, unufoje eĉ malkaŝe deklarita. «Estis komuna opinio», li diras proksimume, «ke da tiaj ŝmiraĵoj oni komponas diversloke, kaj ke multas la artifikoj por ilin apliki: el kiuj kelkaj ŝajnas veraj, aliaj elpensitaj».²¹

²⁰ ĉi tie: en Milano.

²¹ Jen liaj vortoj: Unguenta uero haec aiebant componi conficique multifariam, fraudisque vias fuisse complures; quarum sane fraudum, et artium, aliis quidem assentimur, alias uero fictas fuisse commentitiasque arbitramur. *De Pestilentia quae Mediolani anno 1630 magnam stragem edidit*. Cap. V (N.d.A.). Latine = Tiujn ŝmiraĵojn onidire oni kunmetis kaj komponis multmaniere, kaj pluraj estis la artifikaj vojoj; pri tiuj artifikoj kaj ruzoj, kelkajn ni kredas, dum aliajn ni taksas mensogaj inventaĵoj. *Pri Pesto*

Troviĝis tamen homoj, kiuj pensis ĝisfine kaj ĝismorte, ke ĉio estas imagaĵo: kaj ni scias tion ne rekte el ili, ĉar neniu estis sufiĉe aŭdaca, por esprimi publike ideon tiel opozician al tiu de la publiko; ni ekscias tion el la verkistoj, kiuj mokas aŭ riproĉas aŭ rebatas tian opinion kiel antaŭjuĝon de kelkaj, eraron, kiu ne aŭdacis veni al malkaŝa disputo, kaj tamen vivis; ni scias tion ankaŭ el ricevintaj tiun sciigon per tradicio. «Mi trovis prudentajn homojn en Milano», diras la honesta Muratori²² en la supre-citita teksto, «kiuj ricevis objektivajn raportojn el siaj praavoj, kaj estis nemulte konvinkitaj ke veras tiuj venenaj ŝmiraĵoj». Evidentas, ke la vero estis kaŝe dirata, kvazaŭ sekreta konfidenco: sana saĝo ja ekzistis, sed restis kaŝita pro timo de komuna saĝo.

La magistratanoj, ĉiutage malpli nombraj, kaj pli kaj pli konsternitaj kaj konfuzitaj, aplikis tiun ioman decidemon, kiu al ili ankoraŭ restis, por serĉi da tiaj ŝmiristoj. Inter la tiamaj tekstoj pri l' pesto, gardataj en la supre menciita arkivo, estas letero (sen ajna alia dokumento ĉi-koncerne), per kiu la granda kanceliero serioze kaj tute urĝe sciigas la guberniestron pri ricevita averto, ke en kampar-domo de fratoj Gerolamo kaj Giulio Monti, Milanaj nobeloj, oni komponas da veneno tiom multe, ke kvardek viroj estas okupitaj *en este exercicio*²³ helpate de kvar kavaliroj el Brescia, kiuj alveturigas el Veneci-lando materialon, *para la fábrica del veneno*²⁴. Li aldonas, ke li tutsekrete faris la necesajn dispoziciojn por tien sendi la urbestron de Milano kaj la Sanitaran aŭditoron, kune

kiu en Milano en jaro 1630 grandan mortadon estigis. Ĉap. V.

²² *Muratori*: itala historiisto (1672-1750).

²³ *en este exercicio*: hispane = en tiu laboro.

²⁴ *para la fábrica del veneno*: hispane = por fabrikado de veneno.

kun tridek kavalerianoj; ke, bedaŭrinde, unu el la fratoj estis avertita sufiĉe ĝustatempe, por povi malaperigi la indicojn de la krimo, kaj eble la averto venis el la aŭditorio mem, lia amiko; kaj ke ĉi-lastata pretekstumis, por tien ne veturi; sed ke, spite de tio, la urbestro kun la soldatoj iris *a reconocer la casa, y a ver si hallará algunos vestigios*²⁵, kaj kolekti informojn, kaj aresti ĉiujn eventualajn kulpigitojn.

Verŝajne oni trovis nenion, ĉar la tiamaj skribaĵoj, kiuj parolas pri tiuj suspektitaj nobeloj, nenian fakton citas. Sed, bedaŭrinde, ali-okaze oni kredis trovi.

La procesoj, kiuj okazis konsekvence, ne estis certe la unuaj tiu-specaj: kaj oni eĉ ne povas ilin taksi jurisprudenca²⁶ maloftaĵo. Ĉar, krom antikvaj epokoj, por aludeti nur la tempon proksiman al tiu, kiun ni pritraktas, en Palermo en la 1526-a jaro, en Ĝenevo en 1530 kaj poste en 1545 kaj denove en 1574, en Casale Monferrato en 1536; en Padova en 1555, en Torino en 1599 kaj denove ĝuste en tiu jaro 1630-a, oni procesumis kaj kondamnis al turmentoj ofte plej kruelaj, jen kelke jen multe da malfeliĉuloj kiel kulpajn, ke ili disvastigis la peston, ĉu per pulvoroj, ĉu per ŝmiraĵoj, ĉu per ensorĉoj, ĉu per ĉio tio kune. Sed la afero de la tiel nomitaj Milanaj ŝmiradoj, kiel plej famkonata, eble estas plej observebla; aŭ almenaŭ allasas pli multe por observi, ĉar restis pri ĝi dokumentoj pli detalaj kaj pli aŭtentikaj. Kaj kvankam la verkisto²⁷ supre laŭdita jam pritraktis ĝin, tamen, ĉar, pli ol redakti ties historion, li volis tiri argumentojn por celo pli

²⁵ *a reconocer... vestigios*: hispane = por inspekti la domon, kaj vidi, ĉu spuroj troviĝas.

²⁶ jurisprudenco estas la fakta interpretado de juro farita de tribunaloj.

²⁷ *verkisto*: Pietro Verri.

granda, aŭ certe pli aktuala, ni taksis, ke tiu historio povus esti temo de nova verko. Sed ne temas pri afero tia, ke oni povus elturniĝi per malmulte da vortoj; kaj ne ĉi tie estas la oportuna loko por pritrakti ĝin vaste laŭmerite. Kaj la leganto, haltinte super tiuj eventoj, certe ne plu zorgus pri la resto de nia rakonto. Tial, prokrastante al alia verkaĵo²⁸ ilian historion kaj esploron, ni revenos al niaj roluloj, por ne plu ilin forlasi ĝisfine.

²⁸ verkaĵo: fakte pli poste Manzoni komponis verketon pri la torturo, titolitan *Storia della colonna infame* = Historio de la fifama kolono.

XXXIII

Ian nokton, preskaŭ fine de aŭgusto, ĝuste ĉe l' kulmino de la pesto, revenis Don Rodrigo al sia hejmo en Milano, akompanate de l' fidela¹ Grizulo, unu el la tri aŭ kvar transvivintoj el lia tuta anaro. Li revenis el kunveno de amikoj kutimaj diboĉi kune, por forpeli la malgajon de tiu tempo: kaj ĉiufoje ĉeestis novuloj kaj mankis da malnovaj. Tiutage Don Rodrigo dum la kunveno estis unu el la plej gajaj; kaj interalie li multe ridigis la kunularon per speco de funebra oracio por grafo Attilio, forigita de la pesto antaŭ du tagoj.

Sed marŝante, li sentis ian langvoron, ian deprimiĝon, kruran feblecon, pezan spiradon, internan ardon, kiujn li volis taksi kaŭzitaj nur de vino, de maldormo, de sezono. Dum la vojo li tute mutis; kaj, atinginte la hejmon, kiel unuan aferon li ordonis al la Grizulo, lumigi al li direkte al la dormo-ĉambro. Kiam ili ĝin atingis, la Grizulo observis la vizaĝon de l' mastro: taŭzitan, ardan, kun la okuloj eksterorbitaj, kaj tute brilaĉaj; kaj li restis malproksime: ĉar en tiaj cirkonstancoj ĉia aĉulo devis akiri kuracistan okulon.

«Mi bonfartas, vidu», diris Don Rodrigo, leginte en la sinteno de l' Grizulo la penson kiu trapasis ties menson. «Mi fartas bonege; sed mi drinkis, mi drinkis eble tro multe. Estis tia *vernaccia*²!... Sed per bona dormo, ĉio forpasas. Mi ege dormemas... Forigu de miaj okuloj tiun lumilon, kiu blindigas min. Ĝi ege ĝenaĉas...!». «Ŝerco de *vernaccia*», diris la Grizulo, plu restante distanca. «Sed tuj enlitiĝu, ĉar dormo bonfartigos vin».

«Vi pravas: se mi povas dormi... Cetere mi bonfartas.

¹ *fidela*: kiom fidela, oni vidos baldaŭ.

² *vernaccia* (elp. vernaĉa): itala hela vino.

Metu ĉiuokaze tiun tintilon apud mi, se hazarde ĉi-nokte mi bezonus ion: kaj vi atentu, nu, se eventuale vi aŭdus tinti. Sed mi nenion bezonos... Tuj forportu tiun malbenan lumilon», li daŭrigis, dum la Grizulo plenumis la ordonon, restante kiel eble plej distanca. «Diable, kial do ĝi min ĝenas tiel multe!».

La Grizulo, prenis la lumilon, kaj, dezirinte bonan nokton al la mastro, forrapidis, dum tiu sin ŝovis subkovrilen.

Sed la kovriloj al li pezis kvazaŭ monto. Li forĵetis ilin, kaj li buliĝis por dormi; ĉar fakte li sentis sin ĝis-morte dormema. Sed, fermetinte la okulojn, li ĉiufoje revekiĝis abruptege, kvazaŭ venus iu por spite lin skuegi; kaj li sentis plian varmon kaj ekscitecon. Li denove cerbumis pri aŭgusto, pri *vernaccia*, pri diboĉo; li volis taksi ilin kulpaj de sia stato; sed ĉiufoje al tiuj ĉi ideoj anstataŭiĝis per si mem tiu, kiu akompanis ĉiujn, kaj tiel dire, eniris tra ĉiuj sensoj, enŝteliĝis en ĉiujn parolojn dum la diboĉado, ĉar pli facilis ĝin primoki ol prisilenti: nome la pesto.

Post longa ruliĝado, li fine endormiĝis; kaj li komencis vidi la plej aĉajn kaj plej taŭzajn sonĝojn en la mondo. Kaj, de sonĝo al sonĝo, jen al li ŝajnis ke li troviĝas en granda preĝejo, pli kaj pli interne, meze de homamaso, kaj li mem ne sciis, kiel li eniris, kiel li tion elpensis, ĝuste en tia tempo; kaj pri tio li koleris. Li rigardis la ĉirkaŭstarantojn: ĉiuj flavaj vizaĝoj, konsumitaj, kun blindigitaj sorĉ-fiksaj okuloj, kun pendantaj lipoj; ĉiuj kun vestaĵoj el defalantaj ĉifonoj; kaj tra l' ŝiraĵoj vidiĝis makuloj kaj bubonoj. «Disiĝu, kanajloj!», al li ŝajnis krei, rigardante al la pordo, kiu estis tute fora, kaj akompanante la krion per minacema mieno, sed tute senmove, kaj eĉ retirante sin, por ne tuŝi tiujn malpuraĉajn korpojn, kiuj jam tro multe lin tuŝis ĉiuflanke. Sed neniu el tiuj sensencaj

uloj montris intencon disiĝi, nek ke ili lin aŭdas; ili eĉ plimulte lin premis; kaj precipe al li ŝajnis, ke iu, per kubuto aŭ alio, lin premas maldekstre, inter la koro kaj la akselo, kie li sensis pikon doloran kaj iel pezan. Kaj se li tordiĝis, klopodante liberiĝi, io denove tuj lin trafis en tiu sama punkto. Furioziĝinte, li volis kapti la glavon; kaj al li ŝajnis ke ĝuste ĝi, pro la interpuŝiĝo, supreniris, kaj ke ties pomelo lin premaĉas en tiu punkto; sed, almetinte la manon, li ne trovis la glavon, kaj tamen li sensis pli fortan pikon. Li kriaĉis tute anhele, kaj volis krei eĉ pli forte; kiam al li ŝajnis ke ĉies vizaĝoj sin turnas unudirekten. Ankaŭ li mem rigardis tien; li ekvidis predikejon, kaj el ties parapeto³ elŝoviĝi io konvekso⁴, glata, brileta; kaj poste leviĝi kaj distinge aperi senhara kapo, poste okulparo, vizaĝo, longa blanka barbo, kapuceno elstara el la parapeto ĝistalie: frato Cristoforo. Kiu, trafule minto per ĉirkaŭrigardo la tutan aŭskultantaron, ŝajnis fiksrigardi ja Don Rodrigon, levante samtempe la manon, ĝuste kun la sama gesto, kiun li iam faris en tiu teretaĝa salono de lia domo. Tiam ankaŭ li mem levis rapidege sian manon, kaj faris klopodon, kvazaŭ sin ĵetante por kaptegi tiun brakon etenditan enaere; ia voĉo, kiu obtuze grumblis en lia gorĝo eksplodis je kriego; kaj li vekiĝis. Li faligis la brakon, kiun li efektive estis levinta, li iom penis rekonsciiĝi, tute malfermi la okulojn; ĉar la lumo de la jam plena tago lin ĝenis, same kiel tiu de la kandelo hieraŭ vespere; li rekonis sian liton, sian ĉambron, li konsciiĝis, ke nur temis pri sonĝo: la preĝejo, la popolo, la monako, ĉio malaperis; ĉio, escepte de unu afero: tiu doloro ĉe l' maldekstra flanko. Samtempe li sentis je l' koro fortegan

³ *parapeto*: ĝistalia barilo por eviti defalon.

⁴ *konvekso*: malkava.

anhelan batadon, ĉe-orele kontinuan zumon kaj fajfadon, internan fajron, pezecon en ĉiuj membroj, pli aĉe ol kiam li enlitiĝis. Li hezitis momente, antaŭ ol rigardi la korpo-parton, kie li sentis doloron; fine li malkovris ĝin, li turnis al ĝi timoplenan rigardon; kaj li vidis malpuraĉan malhel-violan bubonon.

La viro sentis sin pereinta: lin invadis la teruro pri morto, kaj eble eĉ pli forta teruro fariĝi predo de l' monatioj, esti portota, ĵetota en la pestulejon. Kaj serĉante artifikon, por eviti tian hororan sortaĉon, li sentis siajn pensojn konfuziĝi kaj malklariĝi, li sentis proksimiĝi la momenton, kiam li ne plu havos cerbon, krom kiom sufiĉos por sin allasi al malespero. Li kaptis la tintilon, kaj svingis ĝin perforte. Aperis tuj la Grizulo, kiu estis alarmopreta. Li ekhaltis iom for de la lito; li rigardis atente la mastron, kaj li certiĝis pri tio, kion li vespere jam konjektis.

«Grizulo!» diris Don Rodrigo, pene leviĝante side: «vi ĉiam estis mia fidindulo».

«Jes, sinjoro».

«Mi ĉiam al vi bonfaris».

«Pro via bonkoreco».

«Je vi mi povas fidi...!».

«Diable!».

«Mi malbonfartas, Grizulo».

«Mi tion rimarkis».

«Se mi resaniĝos, mi al vi bonfaros eĉ plimulte ol kiom mi faris pasintece».

La Grizulo nenion respondis, atendente, kien do celas tiu antaŭparolo.

«Neniun alian mi volas fidi, krom vin», reparolis Don

Rodrigo: «faru al mi komplezon, Grizulo».

«Vi ordonu», diris ĉi-lasta, respondante per kutima formulo al tiu nekutima. «Ĉu vi scias kie loĝas kirurgo Chiodo?».

«Tute jes».

«Li estas honestulo, kiu, se lin riĉe rekompenci, lasas la malsanulojn sekretaj. Iru voki lin: al li diru, ke mi donos al li kvar, ses eskudojn por ĉiu vizito, kaj eĉ pli multe, se plimulte li postulos; sed ke plej frue li venu ĉi tien; kaj la aferon plenumu singarde, tiel ke neniu rimarku ĝin».

«Bona elpensajo», diris la Grizulo: «mi iras kaj tuj reiras».

«Aŭdu, Grizulo, antaŭe donu al mi iom da akvo: mi sentas tian ardon, ke mi ne plu eltenas».

«Ne, sinjoro», respondis la Grizulo: «nenio sen konsento de l' kuracisto. Temas pri kapricaj malsanoj: oni ne perdu tempon. Restu trankvila: per tri saltoj mi revenas kun Chiodo».

Tion dirinte, li eliris, fermetante la pordon.

Don Rodrigo rekuŝiĝis, image akompanis lin al la hejmo de Chiodo, kalkulis la paŝojn, konjektis la tempo-daŭron. De temp' al tempo li rerigardis la bubonon; sed tuj li returnis la kapon, kun abomeno. Post iom da tempo li komencis streĉi la orelojn, por aŭdi, ĉu alvenas la kirurgo: kaj tiu klopodo interrompis la senton pri la morbo, kaj tenis liajn pensojn viglaj. Subite li aŭdas tinton foran, sed ŝajne venantan de la ĉambroj, ne de la strato. Li plu atentis; li aŭdas ĝin pli forta, pli ripeta, kaj samtempe paŝo-bruon: horora suspekto trapasas lian menson. Li sid-leviĝas kaj pli-streĉas la orelojn; li aŭdas obtuzan bruon en la apuda ĉambro, kvazaŭ de pezaĵo de-

metata singarde; li eligas la krurojn el la lito, kvazaŭ por leviĝi, li rigardas al la pordo, li vidas ĝin malfermiĝi, li vidas aperi kaj al li veni du ĉifonajn malpurajn ruĝajn vestaĵojn, du krimulajn vizaĝojn, unuvorte du monatiojn; li vidas duonan vizaĝon de l' Grizulo, kiu kaŝite malantaŭ duonfermita pordoklapo, restas gvate.

«Ha fia perfidulo!... For, kanajlo! Biondino! Carlotto! helpu! oni min murdas!» krias Don Rodrigo; li enŝovas manon sub la kapkusenon, por serĉi pistolon; li ĝin kaptas kaj elŝovas; sed ĉe lia unua ekkrio la monatioj jam ekkuris al la lito, la pli rapida sursaltas, antaŭ ol li povus ion fari; li elŝiras la pistolon de lia mano kaj forĵetas ĝin, li puŝegas lin kuŝe surliten, kaj tie tenas lin, kriante kun mienaĉo plena samtempe de kolero kaj malŝato: «ha fripono! kontraŭ monatioj! kontraŭ tribunalaj oficistoj! kontraŭ plenumantoj de mizerikordaj faroj!».

«Tenu lin firme, ĝis ni forportos lin», diris la kompano, irante al mon-kofro. Ĉe tio la Grizulo eniris, kaj kun li komencis frakasi ties seruron.

«Krimulo!» kriegis Don Rodrigo, rigardante lin el sub la alia, kiu tenis lin, kaj baraktante sub ties fortikaj brakoj. «Lasu min murdi tiun fiulon», li diris al la monatioj, «kaj poste faru el mi, kion ajn vi volas». Kaj denove li vokis per sia tuta voĉo siajn aliajn servistojn; sed estis vane, ĉar la abomeninda Grizulo jam forsendis ilin per fikciaj ordonoj de la mastro mem, antaŭ ol iri proponi al la monatioj veni fari tian ekspedicion kaj dividi la predon.

«Trankvile, trankvile», diris al la malfeliĉega Rodrigo la turmentisto, kiu tenis lin premata surlite. Kaj poste, turnante la vizaĝon al la rabanta duopo, li kriis: «kondu tu honestule!».

«Ci! ci! », muĝis Don Rodrigo al la Grizulo, kiun li vidis klopodanta frakasi, eligi monon kaj objektojn, porciumi. «Ci! pli poste...! Ha, infera diablo! Mi ankoraŭ povas resaniĝi! Mi povas resaniĝi!». La Grizulo tute mutis, kaj laŭpove eĉ ne turniĝis al la direkto, de kie venis tiuj vortoj.

«Tenu lin forte», diris la alia monatio: «li freneziĝis».

Kaj jam nun tio veris. Post granda hurlego, post lasta, pli forta klopodo sin liberigi, li falis subite tute senforta kaj stupora: li tamen ankoraŭ rigardis, kvazaŭ sorĉite, kaj de temp' al tempo li skuiĝis aŭ ekĝemis.

La monatioj kaptis lin, unu ĉe l' piedoj, kaj la alia ĉe la ŝultroj, kaj iris kuŝigi lin sur kuŝportilon, kiun ili estis lasintaj en la apuda ĉambro; poste unu revenis preni la rabaĵon; kaj, levinte la mizeregan pezaĵon, ili portis ĝin for.

La Grizulo restis, por haste elekti eventualan pluan konvenaĵon; li ĉion volv-pakis, kaj foriris. Li estis ja zorginta tute ne tuŝi la monatiojn, nek tuŝiĝi de ili; sed en tiu lasta urĝa palp-serĉo, li ankaŭ kaptis, apud la lito, la vestaĵojn de l' mastro, kaj skuis ilin, por vidi, ĉu enestas mono, nenion alian pensante. Sed li ja pensis tion la postan tagon, kiam, dum li diboĉis en tavernaĉo, subite lin trafis ekstremoj, liaj okuloj lum-blindiĝis, liaj fortoj svenis, kaj li falis. Forlasite de l' kompanoj, li venis en la manojn de l' monatioj, kiuj, nudiginte lin el ĉio bona, kiun li surhavis, lin ĵetis sur ĉaron; sur kiu li formortis antaŭ ol atingi la pestulejon, kien estis veturigita lia mastro.

Nun, lasante ĉi-lastan en tiu malfeliĉejo, ni devas esplorserĉi alian homon, kies historio neniam kolizius kun tiu de Don Rodrigo, se ĉi-lasta mem ne tion estus volinta perforte; oni eĉ povas certe diri, ke ambaŭ tute malhavus historion: mi

aludas Renzon, kiun ni lasis en la nova ŝpinejo, kun la kaŝnomo Antonio Rivolta.

Tie li restis, kvin aŭ ses monatojn, se mi ne eraras; post kiuj, pro l' deklarita konflikto inter la Venecia respubliko kaj la Hispana reĝo, kaj la konsekvenca ĉeso de ĉia timo pri serĉoj kaj puntilioj el Milano, Bortolo zorgis lin rekonduki, kaj denove teni lin kun si, ĉu ĉar li amis lin, ĉu pro tio ke Renzo, estante talenta junulo, kaj lerta ĉe l' metio, estis en la fabriko tre granda helpo al la faktoto, sen la risko ke li mem aspiras okupi lian rolon, pro tiu benata misŝanco, ke li ne kapablis regi skribilon. Ĉar ankaŭ ĉi-lasto motivo iel influis, tial ni devis ĝin menciiti. Eble vi volus Bortolon pli ideala: mi ne scias kion diri: vi kreu lin. La reala Bortolo estis ĉi-tia.

Renzo plurestis por labori ĉe li. Pli ol unufoje, kaj speciale post ricevo de kelke el tiuj benataj leteroj de Agnese, en lia cerbo ekzumis la grilo fariĝi soldato, kaj per tio fini ĉion: oportunoj ne mankis; ĉar, ĝuste dum tiu tempo, la Venecia respubliko bezonis rekruti armeanojn. La tento estis foje des pli forta, ĉar onidire Venecio planis invadi Milanion; kaj kompreneble al li ŝajnis, ke estus bona afero, reveni hejmen kiel venkanto, revidi Lucia-n, kaj fine klarigi ĉion kun ŝi. Sed Bortolo bontone ĉiufoje sukcesis lin senfervorigi pri tiu intenco.

«Se ili devas tien iri», li diris, «ili iros eĉ sen vi, kaj vi povos iri tien pli poste, tute trankvile; se ili male revenus kun rompita kapo, ĉu ne estus preferinde, ke vi restis ĉi tie? Da malesperuloj irontaj trabati la vojon, tute ne mankos. Kaj multe da tempo ja pasos, antaŭ ol ili povos enpaŝi...! Miaflanke, mi estas miskredanto: ili ja bojas; ha jes; Milanlando ne estas buŝpleno tiel facile glutebla. Temas pri

Hispanio, knabo mia: ĉu vi scias kio estas Hispanio? La respubliko de sankta Marko estas fortika hejme; sed necesas alio! Vi paciencu: ĉu vi ne bonfartas tie ĉi?... Mi komprenas kion vi volas diri; sed se en-ĉiele estas destinite ke la afero sukcesu, vi certu ke, se ne fari frenezaĵojn, ĝi sukcesos eĉ pli bone. Ia sanktulo vin helpos. Vi konsideru ke ne temas pri metio taŭga por vi. Ĉu al vi ŝajnas, ke al vi konvenas forlasi bobenadon de silko, por iri murdi homojn? Kion vi volas fari kune kun tiaj uloj? Por tio necesas homoj taŭgaj denaske ».

Alifoje Renzo intencis foriri kaŝe, alivestite, kaj kun falsa nomo. Sed ankaŭ de ĉi tio Bortolo sukcesis lin deturni, per tro konjekteblaj rezonoj.

Kaj kiam la pesto eksplodis en Milano, kaj, kiel ni diris, ĝuste apud la Bergama landlimo, ĝi ne malfruis la limon transpasi; kaj... vi ne konsterniĝu, ĉar mi ne intencas rakonti ankaŭ ĉi tiun historion: se iu ĝin dezirus, ĝi jam ekzistas, verkita, laŭ publika ordono, de iu Lorenzo Ghirardelli: libro tamen rara kaj nekonata, malgraŭ tio, ke verŝajne ĝi enhavas pli da materialo ol ĉiuj plej famaj priskriboj de pestoj amasigite: de tiom da aferoj dependas la famo de libro! Mi nur intencas diri, ke ankaŭ Renzon trafis la pesto, li sin flegis per si mem, tio estas li faris nenion: li atingis eĉ morto-riskon, sed lia fortika kompleksio venkis la furiozon de l' morbo: post malmulte da tagoj li troviĝis ekster danĝero. Ĉe l' reveno de la vivo, pli ol iam ajn revekiĝis en lia animo la memoroj, la deziroj, la esperoj, la vivoplanoj; tio estas, li pli ol iam ajn pensis pri Lucia. Kio do okazis pri ŝi, en tiu tempo, kiam pluvivi estis kvazaŭ escepto? kaj, kvankam tiel proksime, nenion povi sciiĝi pri ŝi! Kaj resti, nur Dio scias kiom longe, en tia malcerteco! Kaj eĉ kiam malcerteco svenus, kiam

eventuale, post ĉeso de ĉia danĝero, li eksciis ke Lucia pluviĝas; tamen restis tiu alia mistero, tiu impliko pri la voto. – Iros mi mem, mi iros konstati ĉion per unu fojo, – li diris al si mem, kaj tion li diris jam antaŭ ol li kapablu firme stari. – Kondiĉe ke ŝi vivu! – Koncerne trovon: mi mem ŝin trovos; mi fine aŭdos ĝuste el ŝia buŝo, kio do estas tiu promeso; kaj mi al ŝi komprenigos, ke la afero ne povas konsisti, kaj mi forkondukos ŝin kun mi, ŝin kaj tiun povran Agnese, se ŝi ankoraŭ vivas! Ŝi ĉiam havis por mi amsenton, kaj mi certas ke ŝi ankoraŭ amas min. Kio pri la aresto? he! nuntempe la malmultaj pluviĝantaj havas alion por cerbumi. Ankaŭ ĉi tie rondiras tute sekure homoj, sur kiuj pezas multe da... Ĉu nur kanajloj rajtas havi paspermeson? Kaj ĉiuj diras ke en Milano regas eĉ pli aĉa konfuzego. Se mi maltrafas tiel feliĉan oportunun – (La peston! Vidu do, kiajn terminojn al ni enbuŝigas tiu benata instinkto ĉion rilatigi kaj subordigi al ni mem!) – alia simila ne plu ripetiĝas! –

Esperinde⁵, mia kara Renzo.

Tuj kiam li sukcesis marŝaĉi, li iris serĉi Bortolon, kiu ĝis tiam sukcesis eviti la peston, kaj tre multe sin gardis. Li ne eniris ties hejmon, sed li vokis el la strato, kaj lin venigis al la fenestro.

«Ha, ha!» diris Bortolo: «vi mem eskapis, bonŝance al vi!».

«Mi ankoraŭ staraĉas malfirme, kiel vi vidas, sed, koncerne danĝeron, ĝi estas for».

«He! mi mem volus staraĉi kiel vi. Diri: mi bonfartas, iam ŝajnis diri ĉion; sed nuntempe tio malmulte valoras. Se oni povas diri: mi fartas pli bone, jen bela vorto!».

⁵ *esperinde*: ke ne plu ripetiĝu pesto.

Renzo, espriminte al la kuzo kelke da bondeziroj, al li komunikis sian decidon.

«Iru ĉi-foje, la Ĉielo benu vin», li respondis: «klopodu eviti la justicon, samkiel mi klopodos eviti la kontaĝon; kaj, se Dio volas, ke ni ambaŭ estu bonŝancaj, ni revidiĝos».

«Ho, mi certe revenos: kaj espereble mi revenu ne sola! Sufiĉe; mi esperas».

«Vi ja revenu akompanate; ĉar, se Dio volas, estos laboro por ĉiuj, kaj ni estos en feliĉa kompanio. Kondiĉe ke vi retrovu min, kaj estu finita tiu ĉi diabla influo!».

«Ni revidiĝos, ni revidiĝos, nepras ke ni revidiĝu!».

«Mi ripetas: Dio volu!».

Dum kelke da tagoj, Renzo faris ekzercojn, por provi siajn fortojn, kaj ilin pliigi; kaj tuj kiam al li ŝajnis ke li povas vojaĝi, li disponiĝis al foriro. Li metis sub siajn vestaĵojn zonon, kaj en ĝin tiujn kvindek eskudojn, kiujn li neniam estis tuŝinta, kaj kiujn li neniam menciatis, eĉ ne al Bortolo; li prenis kelke da aliaj moneroj, kiujn li estis kolektinta tagon post tago, ŝparante pri ĉio; li prenis sub-brake negrandan pakaĵon da vestaĵoj; li enpoŝigis labor-atestilon, kiun li al si havigis por ĉia eventualo, flanke de la dua mastro, ĉe kiu li laboradis kun la kaŝnomo Antonio Rivolta; en pantalonan poŝon li enŝovis tranĉilaĉon, kio estis la minimumo, kiun tiuepoke kunportis honestulo; kaj li ekvojaĝis, en la lastaj tagoj de aŭgusto, tri tagojn post kiam Don Rodrigo estis portita al la pestulejo. Li direktis sin al Lecco, intencante, por ne iri blind-hazarde al Milano, pasi unue tra sia vilaĝo, kie li esperis trovi Agnese-n viva, kaj per ŝi ekscii kelke el la aferoj, kiujn li malpacience scivolis.

La malmultaj resaniĝintoj el pesto vere estis, inter la

cetera loĝantaro, kiel privilegia klaso. Granda parto de la aliuloj langvoris aŭ mortis; kaj la ankoraŭ ne tuŝitaj de l' morbo, vivis en daŭra timo; ili iradis sindetenaj, singardaj, modera-paŝe, kun suspektemaj mienoj, samtempe rapide kaj hezite: ĉar ĉio povus esti kontraŭ ili vund-mortiga armilo. La eks-pestuloj male, preskaŭ tute mem-sekuraj (ĉar havi dufoje peston estis afero pli mirakla ol malofta), vagis tra l' kontaĝo sekuraj kaj senĝenaj; kiel la mezepokaj kavaliroj, ferumite kie ajn feraĵo povis aplikiĝi, kaj rajdante sur paradĉevaloj, ankaŭ ili mem egalmaniere plejeble armaĵitaj, vagadis (de kie tiu glora epiteto: vagaj⁶), sencele kaj hazarde, tra povra piediranta aĉularo el urbanoj kaj kampuloj surhavantaj, por batojn rebati kaj sorbi, nur ĉifonojn. Bela, saĝa kaj utila metio! Ĝuste inda ludi unuarangan rolon en traktato pri politika ekonomiko.

Kun tia sekureco, kiun tamen mildigis la zorgoj, kiujn la leganto scias, kaj malĝoja pro la ofta spektaklo kaj senĉesa penso pri la komuna plago, Renzo marŝis direkte al sia hejmo, sub bela ĉielo kaj tra bela lando, sed nur renkontante, post longaj malĝojegaj senhomaj spacoj, kelkan vagan ombron pli ol vivan homon, aŭ kadavrojn portatajn al subterigo, sen honoro de sepulta celebros, sen ĉanto, sen akompano. Ĉirkaŭ tagmeze, li haltis en arbareto, por manĝi iom da pano kaj kunpanaĵo, kiujn li kunportis. Da fruktoj haveblis ĉe-voje eĉ pli ol bezone: figoj, persikoj, prunoj, pomoj, laŭvole; sufiĉis eniri kampojn, por ilin rikolti, aŭ kolekti sub arboj, kie ili abundis kiel post hajlado; ĉar la jarrikolto estis eksterordinare riĉa, ĉefe koncerne fruktojn; kaj preskaŭ neniuj estis, kiu pri tio zorgus: eĉ la vinberoj kaŝis tiel la vitofoliojn, kaj estis

⁶ La vagaj kavaliroj ne estis ŝatataj de Manzoni, kiu ilin taksis mallaboremaj perfortuloj.

lasitaj al la arbitro de la unua okuponto.

Ĉe l' vesperiĝo li malkovris sian vilaĝon. Ĉe ties ekvido, kvankam tute atendita, li sentis kvazaŭ korpremon: lin obsedis unumomente aro da doloraj memoroj, kaj doloraj antaŭsentoj: al li ŝajnis, ke ankoraŭ reeĥas en liaj oreloj tiuj sinistraj alarmo-sonoroj, kiuj lin iel akompanis kaj persekutis, kiam li forkuris de tiuj lokoj; kaj nunmomente li sentis, se tiel diri, regi mortan silenton. Pli fortan perturbon li sentis atingante la placeton antaŭ l' preĝejo; kaj alian eĉ pli aĉan li atendis ĉe l' fino de l' vojaĝo: ĉar la haltloko kien li celis, estis tiu domo, kiun li alifoje kutimis nomi la hejmo de Lucia. Nun ĝi povus esti, maksimume, nur tiu de Agnese; kaj la ununura graco, kiun li esperis el la ĉielo, estis, trovi ŝin viva kaj sana. Kaj en tiu hejmo li intencis peti gastigon, ĝuste konjektante, ke la lia nur povas esti loĝejo de musoj kaj musteloj.⁷

Por eviti ke oni lin vidu, li eniris eksteran vojeton, tiun saman, tra kiu li estis veninta tiel bele akompanate, en tiu tia nokto, por surprizi la pastron. Ĉirkaŭ mezvoje staris unuflanke la vitejo kaj aliflanke la dometo de Renzo; tiel ke, pasante, li povos viziteti ambaŭ, kaj iom konsciiĝi pri la stato de siaj aferoj.

Marŝante, li rigardis antaŭen, samtempe kun dezirego kaj timo ekvidi onin; kaj fakte, post kelke da paŝoj, li ekvidis viron en ĉemizo, sidanta surgrunde, kun la dorso apogita al jasmena heĝo, en sinteno de senmensulo; kaj el tia sinteno, poste ankaŭ el la fizionomio, al li ŝajnis rekoni tiun povran duonstultan Gervason, venintan kiel duan atestanton en tiu malfeliĉa ekspedicio. Sed proksimiĝinte, li male devis konstati, ke temas pri la tiel sprita Tonio, kiu Gervason estis

⁷*musoj kaj musteloj*: malgrandaj sovaĝaj mamuloj.

kondukinta. La pesto, foriginte samtempe lian korpan kaj mensan forton, evoluigis en lia vizaĝo kaj ĉiu agmaniero la malgrandan kaj kaŝan ĝermon de simileco, kiun li havis kun sia stupora frato.

«Ho Tonio!» al li diris Renzo, haltante antaŭ li: «ĉu estas vi?».

Tonio levis la okulojn, ne movante la kapon.

«Tonio! Ĉu vi ne rekonas min?».

«Kiun ĝi trafas, tiun ĝi trafas», respondis Tonio, restante kun malfermita buŝo.

«Vi estas trafita, ĉu? povra Tonio; sed ĉu vi ne plu rekonas min?».

«Kiun ĝi trafas, tiun ĝi trafas», li replikis, kun ia stulta rideto. Renzo, vidante ke li nenion alian eligos, pluiris sian vojon, eĉ pli malĝoja. Kaj jen aperis el stratangulo io nigra, kiun li tuj rekonis kiel Don Abbondion. Tiu marŝis tute malrapide, portante la bastonon, kvazaŭ de ĝi portate siaflanke; kaj ju pli li proksimiĝis, des pli oni povis konstati, el lia pala kaj minca vizaĝo, kaj el ĉiu movo, ke ankaŭ li tutcerte trapasis sian tempestaĉon. Ankaŭ Don Abbondio rigardis; al li ŝajnis-ne-ŝajnis; li vidis vestaĵon iel fremdan; sed fremdan ĝuste el la Bergama teritorio.

– Sendube estas li! – li diris al si mem, kaj li levis la manojn al la ĉielo, kun esprimo de malĝoja miro, dum la bastono, kiun li tenis en la dekstra mano, restis pendanta enaere, kaj vidiĝis tiuj mincaj brakoj svingiĝi en la lozaj⁸ manikoj, kiuj pasintec ĉirkaŭstreĉis ilin. Renzo plirapidigis la paŝadon, iris al li renkonte, kaj faris al li riverencon; ĉar, kvankam ili iam disiĝis en la maniero, kiun vi scias, li estis

⁸ *lozaj*: malstriktaĵoj, malstreĉaĵoj.

ĉiuokaze lia parokestro.

«Ĉu vi, tie ĉi?» elkriis Don Abbondio.

«Estas mi, tie ĉi, kiel vi vidas. Ĉu oni nenion scias pri Lucia?».

«Kion oni sciu? Oni scias tute nenion. Ŝi estas en Milano, se almenaŭ ŝi estas ankoraŭ en ĉi-mondo. Sed vi...».

«Kaj Agnese, ĉu ŝi vivas?».

«Povas esti; sed kiu tion sciu? Ŝi ne estas ĉi tie. Sed...».

«Kie ŝi estas?».

«Ŝi iris ekloĝi en Valsassina, ĉe siaj tieaj parencoj, en Pasturo, vi ja scias; ĉar tie onidire la pesto ne diablas kiel tie ĉi. Sed vi, mi ripetas...».

«Tion mi bedaŭras. Kaj kio pri patro Cristoforo...?».

«Li foriris jam delonge. Sed...».

«Tion mi sciis; oni tion al mi skribigis: mi demandas, ĉu eventuale li revenis en niajn lokojn».

«Ho ĝuste! oni nenion plu aŭdis pri li. Sed vi...».

«Ankaŭ ĉi tion mi bedaŭras».

«Sed vi, mi ripetas, kiu-cele veni en ĉi-lokojn, pro la Ĉielo! Ĉu vi ne scias pri tiu bagatela arest-ordono...?».

«Kio interesas min? Nuntempe oni havas alion por zorgi. Ankaŭ mi mem fine volas vidi miajn aferojn. Kaj ĉu oni tute ne scias...?».

«Kion vi volas vidi? ke nuntempe neniu kaj nenio plu estas. Kaj mi ripetas, kun tiu bagatela arest-ordono, kial veni ĉi tien, ĝuste en vian vilaĝon, en la lupan buŝegon: ĉu estas prudente? Agu laŭ la prudento de maljunulo, kiu da ĝi tute devas havi pli ol vi, kaj kiu al vi parolas nur pro amo al vi; vi laĉu al vi diligente la ŝuojn; kaj antaŭ ol oni vidus vin, revenu tien, de kie vi venis; kaj se oni vin vidis, des pli rapide. Ĉu al

vi ŝajnas, ke ĉi tia estas atmosfero taŭga por vi? Ĉu vi ne scias, ke oni venis serĉi vin, ke oni traserĉis, traserĉis, ĉion renversis...».

«Mi ja scias bedaŭrinde, kanajloj!».

«Sed kio do!».

«Sed mi al vi ripetas, ke mi ne zorgas pri tio. Kaj tiu viro, ĉu li ankoraŭ vivas? ĉu li estas ĉi tie?».

«Mi al vi diras ke neniu ĉeestas; mi al vi diras, ke vi ne pensu pri aferoj ĉi-tieaj; mi al vi diras ke...».

«Mi demandas, ĉu tiu ulo estas ĉi tie».

«Ho sankta Ĉielo! Parolu pli saĝe. Ĉu eblas, ke vi ankoraŭ surhavas tiun tutan fajron, post tiom da aferoj!».

«Ĉu li ĉeestas aŭ ne ĉeestas?».

«Li ne ĉeestas, nu. Sed la pesto, fileto, la pesto! Kiu do vojaĝas, en ĉi tia tempo?».

«Se ne estus aliaj malfeliĉoj krom pesto en ĉi-mondo... mi parolas pri mi mem: ĝi trafis min, kaj mi estas eskapinta».

«Sed do! sed do! ĉu ĉi tio ne estas averto? Eskapinte tiaĵon, al mi ŝajnas ke oni devus danki la Ĉielon kaj...».

«Mi ja dankas ĝin».

«Kaj ne serĉi aliaĵojn, mi diras. Faru laŭ mia konsilo...».

«Ĝi trafis ankaŭ vin mem, sinjoro pastro, se mi ne eraras».

«Kaj kia pesto! Perfida kaj fia ĝi estis: mi plu vivas nur pro miraklo: sufiĉu diri ke ĝi aĉigis min tiel, kiel vi vidas. Mi nun bezonus ĝuste iom da kvieto, por restarigi min bonstata: nu, mi komencis farti iom pli bone... En nomo de l' Ĉielo, kiucele vi venas ĉi-tien? Reiru...».

«Vi daŭre insistas pri reiro, vi. Por reveni, tiam konvenus tute ne veni. Vi diras: kiucele vi venas? kiucele vi venas? Jen

drolaĵo! Ankaŭ mi mem venas al mia hejmo».

«Via hejmo...».

«Vi diru: ĉu mortis multaj ĉi tie?...».

«He he!» elkriis Don Abbondio; kaj, komencante per Perpetua, li nomis longan vicon da personoj kaj tutaj familioj. Renzo bedaŭrinde atendis tiaĵon; sed, aŭdante tiom da nomoj de konatoj, de amikoj, de parencoj, li staris ĉagrenite, kun mallevita kapo, elkriante ĉiumomente: «povrulo! povrulino! povruloj!».

«Vi do vidas!» daŭrigis Don Abbondio: «kaj la afero ankoraŭ ne ĉesis. Se la restantoj ne aplikas prudenton ĉi-foje, por forpeli ĉiujn grilojn el la kapo, nenio plu restas, krom la mondo-fino».

«Ne dubu; ĉar mi tute ne intencas halti ĉi tie».

«Al Ĉielo estu danko, ke tio eniris vian cerbon! Kaj kompreneble, vi ja intencas reveni en la Bergaman teritorion».

«Pri tio vi ne zorgu».

«Kio! espereble vi ne intencas fari fuŝaĵon pli aĉan ol tiun ĉi».

«Vi ne zorgu, mi ripetas; la afero apartenas al mi; mi ne plu estas infano: mi atingis la prudento-aĝon. Mi esperas ĉiuokaze, ke vi al neniuj diros, ke vi vidis min. Vi estas pastro; mi estas via ŝafo: espereble vi ne intencos perfidi min».

«Mi ja komprenis», diris Don Abbondio, suspirante kolerete: «mi ja komprenis: vi volas pereigi vin mem, kaj pereigi min. Al vi ne sufiĉas la malfeliĉoj, kiujn travivis vi mem; al vi ne sufiĉas tiuj, kiujn travivis mi. Mi ja komprenis, mi ja komprenis», kaj, plu grumblante ĉi-vortojn interdente, li pluiris sian vojon.

Renzo restis malĝoja kaj malkontenta, cerbumante kien iri

gasti. En tiu aro da mortintoj, kiujn Don Abbondio al li listigis, estis tuta familio de kamparanoj forportita de la pesto, escepte de unu junulo, pli-malpli samaĝa kiel Renzo, kaj lia kompano ek de infanaĝo; lia hejmo situis kelkpaŝe ekster la vilaĝo. Li decidis iri tien.

Kaj, irante, li pasis antaŭ sia vitejo; kaj jam de ekstere li tuj povis konjekti, kiel ĝi statas. El la arboj de li lasitaj, oni vidis eĉ ne unu pinteton, eĉ ne unu frondon superi la muron; se io vidiĝis, temis pri aĵoj kreskintaj dum lia foresto. Li enŝovis sin tra l' aperturo (el la krad-pordo eĉ ne la hokoj plu restis); li turnis la rigardon ĉirkaŭen: povra vitejo! Dum du sinsekvaj vintroj la vilaĝanoj venis kolekti brul-lignaĵon «en la loko de tiu povrulo», kiel oni diris. Vitoj, morusujoj, ĉiuspecaj fruktarboj: ĉio estis aĉe elradikigita aŭ tranĉita grund-nivele. Tamen vidiĝis ankoraŭ la spuraĵoj de iama kultivado: junaj vitbranĉoj, laŭ rompitaĵoj linioj, kiuj tamen ankoraŭ markis la spuron de l' detruitaj vito-vicoj; tie kaj ĉi tie ŝosoj aŭ sprosoj⁹ de morusarboj, figuoj, persikujoj, ĉerizujoj, prunarboj; sed ankaŭ ĉi tio vidiĝis disa, sufokita, meze de nova, varia kaj densa vegetaro, naskita kaj kreskinta sen helpo de mano homa. Estis araĉo da urtikoj, filikoj, loloj, graminoj, kenopodioj, sovaĝaj avenoj, verdaj amarantoj, leontodoj, okzalaj, airoj, kaj aliaj similaj plantoj; tio estas: tiaspecaj vegetaĵoj, el kiaj la kamparanoj de ĉiaj landoj formis grandan klason, nomante ilin herbaĉoj, aŭ simile.

Estis ĥaoso el tigoj konkurantaj por superi unu la alian supren, aŭ preterpasi rampante surgrunde, entute rabante spacon ĉiuflanke; konfuzaĵo el folioj, floroj, fruktoj, el cent

⁹ ŝosoj... sprosoj: elkreskantaj branĉoj kaj respektive ĝermoj surbranĉaj.

koloroj, el cent formoj, el cent dimensioj: spiketoj, spadiketoj, grapoloj, penikoj kaj kapituloj blankaj, ruĝaj, flavaj, lazuraj. En tiu tuta araĉo da plantoj, iuj estis pli elstaraj kaj okulfrapaj, sed ne pli bonaj, almenaŭ plejparte: la sovaĝa uvo, plej alta ol ĉiuj, kun siaj etenditaj, ruĝeskaj branĉoj, kun siaj pompaj malhel-verdaj foliegoj, iuj jam rand-purpuraj, kun siaj staraj grapoloj, garnitaj per beroj malsupre violkoloraj, pli supre purpuretaj, poste verdaj, kaj kulmine kun blankeskaj floretoj; la verbasko, kun siaj grandaj lanugaj folioj grund-nivele, kaj la tigo rekta supren, kaj la longaj spikoj disaj kaj kvazaŭ stelgarnitaj per vivkoloraj flavaj floroj: kardoj, kun hirtaj branĉetoj, folioj kaj kalikoj, el kiuj eliris flor-kapituloj blankaj aŭ purpuretaj, aŭ forflugis arĝentaj malpezaj peniketoj, portate de l' vento. Tie ĉi aro da konvolvuloj, volvgrimpaj ĉirkaŭ novaj sprosoj de morusarbo, kovrinte ilin per siaj pendaj folioj, kaj kiuj el la morusarba pinto balancis siajn blankegajn, molajn kloŝflorojn: tie sovaĝa kukurbo, kun siaj vermilionaj beroj, volv-grimpis sur la novaj branĉoj de vito; kiu, vane serĉinte pli fortikan subtenon, reciproke alkroĉis siajn ĉirojn al ĝi; kaj kunmiksante siajn malfortikajn tigojn kaj siajn ne tre malsamajn foliojn, ili reciproke sin tiris teren, kiel ofte okazas al senfortuloj kaptantaj sin reciproke kiel apogilojn. Rubuso regis ĉie: ĝi iris de unu planto al alia, alsupris, desupris, kurbigis aŭ etendis branĉojn, laŭpove; kaj, tranverse ĉe la sojlo, ĝi ŝajnis etendiĝi tie, por malhelpi enpaŝon al la mastro mem.

Sed li tute ne zorgis eniri tian vitejon; kaj verŝajne li ne restis pli longe por rigardi, ol ni por fari ĉi tiun skizon. Li pluiris sian vojon; ne malproksime situis lia hejmo; li transiris la legom-ĝardenon, marŝante ĝis duonkrure inter la herbaĉoj,

kiuj kovris ĝin, samkiel la vitejon. Li enpaŝis en unu el la du teretaĝaj ĉambroj: ĉe l' bruo de liaj paŝoj, ĉe lia kap-enŝovo, jen ekscitiĝo, kruciĝanta disfuĝo de rataĉoj, enŝoviĝo sub la malpuraĵon, kiu kovris la grundon, eksan kuŝejon de la landkneĥtoj. Li ekrigardis la vandojn: malstukitaj, malpurigitaj, fulgo-nigraj. Li levis la okulojn al la plafono: drapaĵo el araneaĵoj. Estis nenio alia. Ankaŭ de tie li foriris, metante malespere la manojn en la kap-harojn; li reiris, trairante denove la padon ĵus trabatitan; post kelke da paŝoj, li ekiris alian vojeton maldekstren, kiu kondukis en kampojn; kaj, sen vidi nek aŭdi homan vivo-signon, li alvenis proksime al la dometo, kie li estis planinta pasloĝi. La vespero jam komencis mallumiĝi. La amiko sidis ĉe l' pordo, sur ligna benketo, kun krucitaj brakoj, la okuloj fiksrigardaj al la ĉielo, kiel homo konsternita de l' malfeliĉoj, sovaĝigita de l' izoleco. Aŭdante paŝo-bruon, li sin turnis, por rigardi, kiu do estas, kaj laŭ tio, kion al li ŝajnis vidi ĉe l' duonlumo, tra la branĉoj kaj frondoj, li diris laŭtvoĉe, ekstarante kaj levante la manojn : «ĉu neniuj estas krom mi? ĉu mi ne laboris sufiĉe hieraŭ? Lasu min kvieti, kaj ankaŭ tio estos mizerikorda faro».

Renzo, ne sciante kion do tio signifas, al li respondis vokante lin laŭnome.

«Ĉu Renzo...!» diris la alia, samtempe elkrie kaj demande.

«Ĝuste mi», diris Renzo; kaj ili kuris unu renkonte al la alia.

«Estas ĝuste vi mem!» diris la amiko, kiam ili estis proksimaj: «ho kian plezuron mi havas, vidante vin! Kiu do tion konjektus? Mi konjektis vin Paolin' de l' mortintoj, kiu ĉiufoje venas turmenti min, por ke mi iru subterigi kadavrojn.

Ĉu vi scias, ke mi restis sola? sola! sola, kiel ermito!».

«Mi ja scias, bedaŭrinde», diris Renzo. Kaj tiel, interŝanĝante kaj kunmiksante rapide salutojn, demandojn kaj respondojn, ili eniris kune en la dometon. Kaj tie, ne interrompante la parolojn, la amiko zorgis honorgastigi Renzon, kiel eblis tiel improvize kaj en tia tempo. Li metis akvopoton sur la fajron, kaj li komencis kuiri polenton; sed li cedis la knedbastonon al Renzo, por ke li mem ĝin knedmiksi; kaj li eliris dirante: «mi restis sola; ve! mi restis sola!».

Li revenis kun siteleto da lakto, kaj iom da sekigita viando, kun du molaj fromaĝetoj, kun figoj kaj persikoj; li demetinte ĉion, elkaldronigis la polenton sur la ligno-platon, kaj ili ĉe-tabliĝis kune, dankante reciproke unu pro la vizito, la alia pro la gastigo. Kaj post eble du-jara foresto, ili subite malkovris sin pli amikaj ol ili konsciis en la tempo, kiam ili vidis sin reciproke preskaŭ ĉiutage; ĉar al ambaŭ, notas ĉi tie nia manuskripto, estis okazintaj da tiaj aferoj, kiuj spertigas kia balzamo estas por animo la bonvolo: ĉu la bonvolo, kiun oni sentas en si mem, kaj tiu kiun oni trovas en aliuloj.

Certe, neniu povus ĉe Renzo anstataŭi Agnese-n, nek lin konsoli pri ŝia foresto, ne nur pro tiu delonga kaj speciala am-sento, sed ankaŭ ĉar, inter la aferoj, kiujn li malpacienkis deĉifri, unu estis, pri kiu nur ŝi havis la ŝlosilon. Li restis momente hezita, ĉu daŭrigi sian vojaĝon, aŭ antaŭe serĉi Agnese-n, ĉar li estis ne for de ŝi; sed, konsidere, ke pri la farto de Lucia, Agnese tute nenion scios, li konfirmis sian unuan intencon iri solvi senpere tiun ĉi dubon, kaj ekkoni ŝian starpunkton, kaj poste li mem porti pri ŝi novaĵojn al ŝia patrino. Tamen, ankaŭ per la amiko li eksciis multe da aferoj, kiujn li ne konis, kaj pri multaj, kiujn li ne bone sciis, li ricevis

klarigon: koncerne la eventojn de Lucia, kaj la persekutojn faritajn kontraŭ li, kaj kiel Don Rodrigo foriris kun subtitrita vosto, kaj oni ne plu vidis lin en tiuj lokoj; sume, tiun tutan intrigon de aferoj. Renzo ankaŭ eksciis (kaj tio estis por li ne eta ekkono) la ĝustan familian nomon de Don Ferrante; ĉar Agnese ja skribigis ĝin per sia sekretario; sed nur la ĉielo scias, kiel tio estis skribita, kaj la bergama interpretisto, legante al li la leteron, elformis vorton tian, ke se Renzo, irus serĉi per ĝi ties adreson en Milano, verŝajne li tute ne trovus homon kiu divenus, pri kiu li intencas paroli. Kaj tamen tiu estis la ununura fadeno, kiun li havis, por iri serĉe al Lucia. Koncerne la justicon, li pli kaj pli konfirmis la opinion, ke temas pri sufiĉe fora danĝero, tiel ke li ne zorgu: sinjoro urbestro mortis pro pesto: neniu scias kiam oni sendos alian; ankaŭ la sbiraro plejparte forpasis; la restantoj havis por zorgi alion ol pasintajn aferojn.

Renzo siaflanke rakontis al la amiko siajn travivaĵojn, kaj li ricevis reciproke cent historietojn, pri la trapaso de l' armeo, la pesto, la ŝmiristoj, la antaŭsignoj. «Temas pri aĉegaj aferoj», diris la amiko, akompanante Renzon en ĉambron senhomigitan fare de l' pesto; aferoj, kiujn oni neniam pensis, ke oni vidos; aferoj taŭgaj por forigi la gajon dum la tuta vivo; kaj tamen, se paroli pri ili inter amikoj, estas konsole».

Ĉe l' tagiĝo, jen ambaŭ estis en la kuirejo; Renzo en teniĝo por vojaĝo, kun sia zono kaŝita sub la jakego, kaj la tranĉilaĉo en la pantalona poŝeto: la pakajeton, por marŝi pli rapide, li lasis depone ĉe l' gastiganto. «Se la afero al mi prosperas», li diris, «se mi trovas ŝin viva, se, sufiĉe... mi repasas tra ĉi tie; mi rapidas al Pasturo, por alporti la bonan novaĵon al tiu povra Agnese, kaj poste, kaj poste... Sed se pro

malfeliĉo, pro malfeliĉo, kiun Dio ne permesu... tiam, mi ne scias, kion mi faros, mi ne scias, kien mi iros: certe, en tiuj ĉi lokoj vi ne plu min vidis». Kaj tion dirante, stare ĉe l' sojlo, kun levita kapo, li rigardis kun sento miksitita el tenereco kaj kor-premo la aŭronon de sia vilaĝo, kiun li jam de longe ne plu vidis. La amiko al li diris, laŭkutime, bonesperajn vortojn; li volis ke li kunprenu ion por manĝi; li iom akompanis lin survoje, kaj forsalutis lin kun denovaj bondeziroj.

Renzo ekvojaĝis tute senurĝe, pro tio ke li taksis, ke sufiĉas alveni proksime al Milano en tiu tago, intencante eniri morgaŭ tute frue, kaj tuj komenci la elserĉon. La vojaĝo okazis sen akcidentoj kaj sen io, kio povus distri Renzon de liaj pensoj, krom la kutimaj mizeroj kaj malĝojoj. Kiel li jam faris en la antaŭa tago, li haltis siatempe en arbareto, por iomete manĝi, kaj ripozi. Pasante tra Monza, antaŭ malfermita butikoj, kie estis elmontritaj panoj, li petis du da ili, por neniukaze resti senproviza. La bakisto al li ordonegis ne eniri, kaj al li etendis sur eta plato taseton kun akvo kaj vinagro¹⁰, dirante ke li ĵetu tien la monerojn; kiam tio estis farita, li, per ia risorta prenilo al li etendis po unu la du panojn, kiujn Renzo enŝovis en po unu poŝon.

Preskaŭ vespere, li atingas Grecon, ne sciante tamen ties nomon; sed parte pro ioma memoro pri la lokoj de la alia vojaĝo, kaj parte kalkulante la vojon iritan post Monza, konjektante ke li ne malproksimas de la urbo, li forlasis la ĉefvojon, por eniri en la kampojn serĉe al kampula kabano, kaj tie tranokti; ĉar kun trinkejoj li tute ne intencis havi koncernon. Li trovis pli bone ol li serĉis: li vidis aperturon en heĝo cirkaŭbaranta la korton de kampula kabano; li decidis

¹⁰ *vinagro*: iama desinfektilo.

eniri. Neniu ĉeestis: li vidis ĉe unu angulo grandan portikon, kaj sub ĝi amasigitan fojnon, kaj porteblan ŝtupetaron al ĝi apogitan; post cirkaŭrigardo, li alsupris aventure; li sin kuŝigis por dormi, kaj fakte li tuj endormiĝis, kaj vekigis nur ĉe l' tagiĝo. Tiam li rampis ĝis la rando de l' granda lito; li elklinis la kapon, kaj vidante neniun, li desupris tra kie li estis alsuprinta, eliris tra kie li estis enirinta, ekmarŝis tra padetoj, havante kiel polusan stelon la Milanan katedralon; kaj post tute mallonga iro, li troviĝis sub la muregoj de Milano, inter la Pordego Orienta kaj la Nova, kaj tre proksime al ĉi-lastata.

XXXIV

Koncerne la manieron enŝteliĝi en la urbon, Renzo estis pli-malpli informita, ke estas ja donitaj plej severaj ordonoj, tute neniun allasi sen sanitara atestilo; sed ke, se esti apenaŭ kapabla malimplkiĝi kaj eluzi oportunon, oni facilege eniras. Kaj fakte tiel ĉi statis la afero; krom la ĝeneralaj kaŭzoj, pro kiuj tiuepoke ĉia ordono estis malmulte obeata; krom la specialaj, kiuj malhelpis la rigoran plenumon de tiu ĉi ordono; Milano stataĉis tia, ke oni ne vidis, kiucele gardi ĝin, kaj kontraŭ kio; kaj ĉia eventuala eniranto povus aspekti pli malzorga por sia propra sano ol danĝera por tiu de l' urbanoj.

Surbaze de tiuj ĉi sciigoj, la plano de Renzo estis provi eniri tra la unua pordego, kiun li trafos; se malhelpo estiĝos, li pluiru ekstere de l' muregoj, ĝis li trovos alian pli facile traireblan. Kaj ne sciatas, kiom da pordegoj li imagis ĉirkaŭ Milano. Alveninte do al la muregoj, li ekhaltis por ĉirkaŭrigardi, kvazaŭ homo kiu, ne sciante en kiun direkton sin turni, esperas kaj serĉas indicon el ĉio ajn. Sed, dekstre kaj maldekstre, li vidis nur du pecojn de nereкта vojo; fronte, parton de murego; neniloke signoj pri vivantaj homoj: nur tio, ke el iu punkto de la taluso leviĝis kolono el malhela kaj densa fumo, kiu alsuprante plivastiĝis kaj volviĝis je ampleksaj globoj, svenante poste en la senmova kaj morna aero. Temis pri bruligataj vestaĵoj, litoj, kaj aliaj infektitaj garnaĵoj: kaj da tiaj tristaj brulegoj oni faris kontinue, ne nur tie, sed en diversaj flankoj de l' muregoj.

La vetero estis malhela, la aero peza, la ĉielo tute vualita per nubo aŭ nebulego egala, senmova, kiu ŝajnis forteni sunon, ne tamen prognozante pluvon; la ĉirkaŭa kamparo estis parte senkultura, kaj tute seka; ĉiu verdaĵo paliĝinta, kaj eĉ ne unu

roso-guto sur la velkaj kaj pendaj folioj. Tiu soleco, tiu silento, tiel proksime al granda urbo, aldonis eĉ novan konsternon al la malkvieto de Renzo, kaj igis ĉiujn liajn pensojn eĉ pli sombraj.

Tie li iomete haltis, kaj poste sin direktis dekstren laŭhazarde, irante sence al la Nova pordego, kiun, malgraŭ ties proksimeco, li ne povis ekvidi, pro la bastiono,¹ kiu tiutempe ĝin kaŝis. Post kelke da paŝoj, li komencis aŭdi tintadon, kiu de temp' al tempo ĉesis kaj rekomenciĝis, kaj pli poste kelkan homan voĉon. Li pluiris kaj, preterinte la bastionon, li vidis kiel unuan aferon lignan barakon, kaj ĉe l' sojlo gardiston apogitan al muskedo, kun mieno iel laca kaj malzorga: malantaŭe staris barilo el tabuloj, kaj post ĝi la pordego, tio estas du muraj alaĉoj² kun tegmenteto ŝirmanta la pordo-klapojn; ĉi-lastaj estis tute malfermitaj, same kiel la krad-pordo de la ligna barilo. Tamen, ĝuste antaŭ ties aperturo, kuŝis trista malhelpaĵo: brankardo, sur kiun du monatioj estis kuŝigantaj kompatindulon, por lin forporti. Temis pri la ĉefimpostisto, kiun oni ĵus malkovris pesta. Renzo haltis, atendante la finon. Kiam la grupeto foriris, kaj li vidis, ke neniu venas refermi la krad-pordon, li taksis la momenton oportuna, kaj tien li rapidis; sed la gardisto tute krude al li kriaĉis: «ho-la!». Renzo ekhaltis denove, okulumis kaj elpoŝigis duonan dukaton, kaj ĝin montris al li. Tiu, aŭ ĉar eks-pestulo, aŭ ĉar li peston timis malpli ol kiom li ŝatis duon-dukatojn, gestis al Renzo ke li ĵetu ĝin; kaj vidinte ĝin tuj flugi al liaj piedoj, li flustris: «antaŭen rapide». Renzo ne atendis ripeton; li preterpasis la barilon, trapasis la pordegon, pluiris,

¹ *bastiono*: elstara parto de fortikaĵo.

² *alaĉoj*: du aĉaj *aloj*, t.e. flankaj muretoj, limigantaj la pordo-spacon.

de neniu vidite nek atentate; nur post eble kvardek paŝoj li aŭdis alian «ho-la», kiun alia impostisto kriis post lin. Ĉi-foje li ŝajnis ne aŭdi, kaj plirapidis, eĉ ne retro-rigardante. «Ho-la!» kriis denove la impostisto, tamen kun voĉo, kiu esprimis malpaciencon pli ol rezolutecon esti obeata; kaj, ne obeite, li skuis la ŝultrojn, kaj revenis en sian kabanaĉon, kiel persono, kiu plimulte zorgas ne proksimiĝi al vojaĝantoj, ol informiĝi pri iliaj aferoj.

La strato enirita de Renzo kondukis, tiam kiel nuntempe, rekte al la naviga kanalo nome *Naviglio*: ĝiajn flankojn konsistigis legom-ĝardenaj heĝoj aŭ muroj, preĝejoj kaj monakejoj, kaj nemulte da domoj. Fine de tiu ĉi strato, kaj meze de tiu, kiu bordas la kanalon, staris kolono kun kruco, nomita kruco de sankta Eŭzebio. Kaj kiom ajn Renzo rigardis antaŭen, li vidis nur tiun krucon. Atinginte la voj-krucliĝon, kiu pli-malpli dividas duone la straton, kaj rigardante ambaŭflanken, li vidis dekstre, en la tiel nomita stratego de sankta Tereza, urbanon, kiu venis ĝuste liadirekten. – Jen fine unu kristano! – li diris al si mem; kaj li tuj sin turnis tien, kun la intenco lin demandi pri la ĝusta vojo. Ankaŭ tiu viro jam vidis la fremdulon alveni, kaj rigardegis lin de malproksime, kun suspektema okulo; des pli kiam li ekvidis ke, anstataŭ pluri por siaj aferoj, li venas ĝuste liadirekten. Renzo, alveninte ne for de li, deprenis sian ĉapelon, kiel respektema montarano; kaj tenante ĝin per la maldekstra mano, li metis la alian en la kapumon, kaj alpaŝis rekte al la nekonato. Sed ĉi-lasto, strabigante la okulojn, retro-paŝis, levis sian nodozan bastonon, kaj turninte ties feran pinton kontraŭ la talion de Renzo, kriis: «for! for! for!».

«Ho ho!» kriis siaflanke la junulo: li al si remetis la

ĉapelon surkapen, kaj, ĉar li tute ne intencis estigi kverelon en tiu momento, kiel li diris pliposte, rakontante la aferon, li turnis la dorson al tiu strangulo, kaj pluiris sian vojon, aŭ pli ĝuste la vojon sur kiu li hazarde troviĝis.

Ankaŭ la alia pluiris la sian, tute ekscitite, kaj retro-rigardante ĉiumomente. Kiam li atingis sian hejmon, li rakontis, ke al li proksimiĝis ŝmiristo, kun humila, milda mieno, kun vizaĝo de fia hipokritulo, tenante enmane la skatoleton de ŝmiraĵo, aŭ volvaĵon de pulvoro (li ne tute certis, kiu el la du aferoj), kaŝitan en la kapumo de l' ĉapelo, por fari al li fi-faron, se li ne sukcesus fortenti lin. «Se li proksimiĝus unu pluan paŝon», li aldonis, «mi tuj lin trapikus, antaŭ ol la kanajlo havus tempon por aranĝaĉi min. Malfeliĉe estis, ke ni estis en tiel izola loko, ĉar, se tio okazus meze de Milano, mi vokus homojn, por ke oni min helpu kapti lin. Tiuokaze tutcerte oni trovus tiun kriman aĉaĵon en lia ĉapelo. Sed tie, sola kun sola, mi povis nur fortimigi lin, ne riskante altiri sur min malfeliĉaĵon; ĉar iom da pulvoro estas tuj ĵetita; kaj tiaj homoj havas specialan lertecon; kaj krome ili havas la diablon siafavore. Supozeble li nun rondiras tra Milano; kaj ne sciatas, kian hombuĉadon li kaŭzas!». Kaj dumvive, tio estas dum multe da jaroj, ĉiufoje kiam oni parolis pri ŝmiristoj, li ripetis sian historion kaj aldonis: «Tiuoj kiuj ankoraŭ neas, ke tio veris, ne al mi tion diru; ĉar oni devus esti vidinta la aferojn, kiujn vidis mi mem».

Renzo, tute ne imagante de kia danĝero li eskapis, kaj ekscitite pli pro kolero ol pro timo, dum-marŝe pensis, pri tiu akcepto, kaj divenetis, kion do tiu nekonato pensis pri li; sed la afero al li ŝajnis tiel malracia, ke li konkludis en si mem ke tiu homo nepre estas duon-freneza. – La afero komenciĝas

malbone, – li pensis: – ŝajnas ke estas misplanedo super mi en tiu ĉi urbo. Por eniri, ĉio iras glate; poste, kiam mi estas enurbe, mi trovas la ĉagrenojn tie pretaj. Sufiĉe... per la helpo de Dio... se mi trovas... se mi sukcesas trovi... he! ĉia pasintaĵo estos kiel nenio.

Atinginte la ponton, li senhezite turniĝis maldekstren, en la Sankta-Marko-straton, ĉar al li prave ŝajnis, ke ĝi kondukas internen de la urbo. Kaj, plu irante, li disrigardis, por vidi, ĉu li malkovras homan estaĵon; sed nenium li vidis, krom misforman kadavron en la eta fosaĵo inter tiuj nemultaj domoj (kiuj tiutempe estis eĉ malpli multaj) kaj parto de la strato. Transirinte tiun parton, li aŭdis krii: «ho viro!», kaj rigardante tiudirekten, li vidis ne malproksime, sur teraseto de izola dometo, povran virinon, kun aro da infanetoj ĉirkaŭe; ŝi, plu vokante lin, al li ankaŭ gestis per la mano. Li alkuris; kaj kiam li apudis, «ho junulo», diris tiu virino: pro viaj povraj mortintoj, faru kristanan bonfaron: iru avizi la komisaron, ke ni estas ĉi tie forgesitaj. Oni trudfermis nin hejme kiel suspektajn, ĉar mia povra edzo mortis; oni najlis nian pordon, kiel vi vidas; kaj de post hieraŭ matene neniu venis porti al ni por manĝi. Dum tiom da horoj de nia restado ĉi tie, trafis ĉi tien nenia homo, kiu ĉi tian karitaton al ni praktikus: kaj ĉi povraj senkulpuloj mortas de malsato».

«De malsato!» elkriis Renzo, kaj enpoŝiginte la manojn, «jen, jen», li diris, eligante la du panojn: «desuprigu al mi ion, por ilin enmeti».

«Dio rekompencu vin laŭmerite; atendu momenton», diris tiu virino; kaj ŝi iris serĉi korbeton, kaj ŝnuron por ĝin desuprigi, kiel ŝi faris. Renzo rememoris la panojn kiujn li trovis apud la kruco, okaze de sia unua eniro en Milanon, kaj

li pensis: – jen: ĝi estas redono, kaj eble eĉ pli bone ol se ilin mi redonus al ilia proprietulo; ĉar ĉi tie vere temas pri kristana bonfaro –.

«Rilate la komisaron, kiun vi diras, ho virino», li aldonis, dum li enkorbigis la panojn, «mi tute ne povas al vi fari servon, ĉar verdire mi estas fremdulo, kaj mi tute ne spertas pri tiu ĉi loko. Tamen se mi renkontas homon iom malsovaĝan kaj humanan, tiel ke oni povas al li paroli, mi al li tion diros».

La virino petis ke li bonvole tiel faru, kaj diris al li la nomon de tiu strato, por ke li povu indiki ĝin.

«Mi pensas, ke ankaŭ vi mem», reparolis Renzo «povas fari al mi komplezon, veran kristanan bonfaron, sen viaflanka ĝeno. Domo de kavaliroj, de grandaj senjoroj, tie ĉi, en Milano, domo ***, ĉu vi scipovus al mi sciigi, kie ĝi estas?». «Mi scias ke ja ekzistas tiu domo», respondis la virino: «sed kie ĝi situas, mi tute ne scias. Pluirante, vi certe trovos homon, kiu ĝin indikos. Kaj vi memoru avizi lin ankaŭ pri ni mem».

«Ne dubu», diris Renzo, kaj li plu iris.

Ĉiupaŝe, li aŭdis pli kaj pli laŭtiĝi kaj proksimiĝi bruon jam aŭditan dum li tie haltis por paroli: bruon de radoj kaj ĉevaloj, kun sono de tintiloj, kaj de temp' al tempo klakon de skurĝoj, kun akompano de kriegoj. Li rigardis antaŭen, sed nenion li vidis. Atinginte la finon de tiu strato, kie aperis antaŭ liaj okuloj la placo de Sankta Marko, la unua afero kiu trafis lian rigardon, estis du staraj fostoj³, kun ŝnuro kaj pulioj⁴; kaj li ne penis rekoni (ĉar temis pri objekto tiutempe diskonata) abomenindan torturan aparaton. Ĝi estis starigita en tiu loko, kaj ne nur tie, sed en ĉiuj placoj kaj stratoj pli vastaj, tiel ke la

³ *fostoj*: starantaj stangoj aŭ palisoj.

⁴ *pulioj*: radoj kun kavigitaj randoj, por glitigi en ili ŝnuron.

delegitoj de ĉiu kvartalo, provizite ĉi-cele per plej arbitreca rajtigo, povis senpere ĝin apliki al ĉiu ajn, kiu ŝajnus al ili puninda: kvarantenuloj elirintaj de-hejme, aŭ subuloj ne plenumintaj sian devon, aŭ ajna aliulo. Temis pri unu el la ekscesaj kaj senefikaj rimedoj, kiujn oni senŝpare aplikis tiuepoke, kaj speciale en tiuj momentoj.

Nu, dum Renzo rigardas tiun aparaton, cerbumante, kial do ĝi estas starigita en tiu loko, li aŭdas la bruon pli kaj pli proksimiĝi, kaj li vidas aperi el malantaŭ la preĝej-angulo viron, kiu skuas tintilon: estis avertisto; kaj post li du ĉevaloj, kiuj venis, pene streĉante la kolon, kaj puŝpremante la hufojn; kaj, de ili trenate, ĉaro plenplena de kadavroj, kaj post ĝi dua, kaj tria, kaj plua; kaj ambaŭflanke monatioj, ĉe l' ripoj de l' ĉevaloj, ilin instigante per skurĝo-batoj, per pikoj, per blasfemoj. Tiuj kadavroj estis plejparte nudaj, kelkaj misvolvitaj en ĉifonoj, amasigitaj, kunplektitaj, kvazaŭ implikaĵo el serpentoj iom post iom disvolviĝantaj ĉe l' printempa varmeto; ĉar, ĉe ĉia obstaklo, ĉe ĉia skuo, oni vidis tiujn fatalajn amasojn aĉe skuiĝi kaj malordiĝi, kaj kapojn ekpendi, kaj virgecajn kapharojn renversiĝi, kaj brakojn malplektiĝi kaj bati kontraŭ radojn, al la jam hororigita okulo montrante kiel tia spektaklo povas fariĝi eĉ pli dolora kaj forpuŝa.

La junulo, haltinte ĉe angulo de la placo, apud la kanal-barilo, preĝis por tiuj nekonataj mortintoj. Terura ekpenso trapasis lian menson: – eble tie, tie kune, tie sube... Ho Sinjoro! faru, ke tio ne veru! faru ke tion mi ne pensu! –

Post forpaso de l' funebra ĉararo, Renzo ekmarŝis, transiris la placon, kaj sin direktis maldekstren laŭlonge de la kanalo, sen alia kialo por tiu elekto, krom ke la ĉararo sin direktis aliflanken. Irinte la nemultajn paŝojn inter la preĝeja

flanko kaj la kanalo, li ekvidis dekstre la Marcellino-ponton; li tien sin direktis, kaj atingis al Borgo Nuovo. Kaj rigardante antaŭen, daŭre kun la intenco serĉi vojo-indikanton, li vidis ĉe la strat-fino pastron, kun jakego anstataŭ sutano⁵, kiu tenis enmane etan bastonon, kaj staris ĉe duonfermita pordo, kun klinita kapo kaj orelo ĉe ties fendeto; kaj post nemulte li vidis lin levi la manon, kaj fari beno-signon. Li konjektis tion, kio fakte estas: ke li finas konfes-prenon de homo; kaj li diris al si mem: – tiu ĉi estas la viro taŭga por mi. Se pastro, rolanta kiel pastro, ne havas iom da karitato, iom da amo kaj da bontono, oni devas diri, ke ne plu ekzistas da tiaĵo en ĉi mondo –.

Dume la pastro, deirinte de la pordo, venis direkte al Renzo, tenante sin kun granda singardo meze de la strato. Renzo, alveninte al li proksime, deprenis sian ĉapelon, kaj al li gestis, ke li deziras alparoli, samtempe haltante, tiel ke tiu komprenu, ke li ne proksimiĝos pli multe. Ankaŭ la pastro ekhaltis, kun gesto de aŭskultonto, sed fiksante grunden la bastoneton antaŭ si, kvazaŭ remparon. Renzo prezentis sian demandon, kiun la pastro kontentigis, ne nur sciigante al li la nomon de la strato, kie la domo situis, sed, rimarkante ke la povrulo tion bezonas, ankaŭ havigante iom da itinero⁶; tio estas indikante, per dekstroj kaj maldekstroj, per preĝejoj kaj krucoj, la ceterajn ses aŭ ok stratojn, kiujn li devos transiri, por atingi la celon.

«Dio gardu vin sana, en ĉi tia tempo, kaj ĉiam», diris Renzo: kaj dum tiu ekforiris, «alian karitaton», li aldonis; kaj al li diris pri la povra forgesita virino. La bona pastro dankis siaflanke, ke tiu havigas al li oportunon fari tiel necesan

⁵ *sutano*: pastra robo (kiu pro sia longeco povis plifaciligi kontaĝon).

⁶ *itinerio*: detala plano de la irotaj vojoj.

karitaton; kaj, dirante ke li iras avizi la laŭdevajn homojn, li pluiris. Ankaŭ Renzo ekiris, kaj, marŝante, li klopodis ripeti al si mem la itineron, por ne bezoni denove fari demandojn ĉe ĉiu stratangulo. Sed vi ne povus imagi kiom tiu ĉi operacio estis peniga, ne pro ties malfacilo en si mem, sed pro nova maltrankvilo tiam estiĝinta en lia animo. Tiu strato-nomo, tiu voj-indiko tute konsternis lin. Temis pri indico de li dezirita kaj demandita, kaj nepre necesa; kaj nenio alia estis al li dirita, kio povus estigi sinistran aŭguron; sed kio? tiu malpli konfuza ideo pri proksima fino, kie li ĉesigos sian grandan dubon, kie li povos aŭdi: ŝi vivas, aŭ: ŝi mortis; tia ideo tiel skuis lin, ke, tiumomente, li preferus esti ankoraŭ en tuta mallumo, ankoraŭ ĉe l' komenco de l' vojaĝo, kies finon li estis atingonta. Li tamen kolektis siajn fortojn kaj diris al si mem: – He, se oni nun komencas konduti infanece, kien do iros la afero? – Tiele sin firmiginte laŭpove, li pluiris sian vojon internen de la urbo.

Kia urbo! kaj kompare, kia ĝi estis antaŭ unu jaro pro l' malsatego!

Renzo estis hazarde pasanta ĝuste tra unu el la plej mizeregaj kaj afliktegaj urbo-partoj: tiu voj-kruĉiĝo, kiu nomiĝis *carrobio* de Nova Pordego. (Tiam staris meze de ĝi kruco, kaj fronte al ĝi, apud la loko kie nun estas la preĝejo de sankta Francisko de Paola, staris malnova preĝejo nome de sankta Anastazia). Tia estis en tiu medio la furiozo de l' kontaĝo, kaj tia la odoraĉo de l' tie forlasitaj kadavroj, ke la malmultaj transvivintoj estis devigitaj foriri amase: tiel ke, al la ĉagreno, kiun donis al la pasanto tiu aspekto de soleco kaj forlasiteco, aldoniĝis la hororo kaj hideco de l' spuroj kaj restaĵoj de l' ĵusa loĝado. Renzo plirapidigis la paŝadon, kuraĝigante sin per la penso, ke la celo ne tiel proksimas, kaj

ke antaŭ ol atingi ĝin, li espereble trovos la scenon almenaŭ parte ŝanĝita; kaj fakte, post nemulte, li atingis lokon, kiun oni iel rajtis nomi urbo de vivantoj; sed kia urbo ankoraŭ, kaj kiaj vivantoj! Fermegitaj, pro suspekto kaj pro teruro, ĉiuj ĉestrataj pordoj, escepte de la tute malfermitaj, ĉar domoj ne-loĝataj, aŭ invaditaj; aliaj, najlitaj kaj sigelitaj, pro tio ke tie oni mortis aŭ malsanis de pesto; aliaj karbe signitaj per kruco, por indiko al la monatioj, ke tie kuŝas mortintoj por forporti: ĉio hazardaĉe kaj senregule, laŭ tio ke ĉi tie aŭ tie troviĝis aŭ ne troviĝis sanitara komisaro aŭ alia oficisto intencanta plenumi la ordonojn, aŭ fari arbitran perforon. Ĉiuloke ĉifonoj kaj, pli repuŝaj ol ĉifonoj, pusaj bandaĝoj, aŭ malpuraĉa pajlaĵo, aŭ littukoj deĵetitaj tra l' fenestroj; foje kadavroj, aŭ de subite mortintaj surstrate kaj tie forlasitaj, ĝis pasos ĉaro por ilin forporti, aŭ defalintaj de tiuj ĉaroj, aŭ eĉ deĵetitaj tra l' fenestroj: tiagrade la obstino kaj furiozo de la plago sovaĝigis la animojn, kaj forgesigis ĉian kompatan zorgon, ĉian socian respekton! Ĉesigita estis ĉia bruo de butikoj, ĉia knaro de kaleŝoj, ĉia krio de vendistoj, ĉia babilo de pasantoj; tute malofte tiun mortan silenton rompis alio krom bruo de sepultaj ĉaroj, lamentoj de malriĉuloj, plendoj de malsanuloj, kriegoj de frenezuloj, krioj de monatioj. Matene, tagmeze kaj vespere, katedrala sonorilo signalis, ke oni recitu certajn preĝojn, kiujn preceptis la ĉefepiskopo: al tiu sonoro respondis la sonoriloj de l' ceteraj preĝejoj; kaj tiam vi povus vidi homojn prezentiĝi al fenestroj, por preĝi kune; kaj aŭdi flustradon de voĉoj kaj ĝemoj, kiu elspiris malĝojon miksitan kun iom da konsolo.

Kiam jam mortis eble du trionoj de la urbanoj, jam foriris aŭ malsaniĝis plej granda parto el la ceteraj, reduktiĝis aŭ

preskaŭ ĉesis la almigrado de ekstere: inter la malmultaj, kiuj tramarŝis la stratojn, dum longa spaco oni trafus tute neniun, kiu ne havis ion strangan, indican de fatala stato-ŝanĝo. Oni vidis plej eminentajn virojn sen mantelego nek mantelo, tiam tute esenca parto de l' civila vestaĵaro; sensutanaj la pastrojn, kaj eĉ monakojn en jakego; entute estis demetita ĉia vestaĵo, kiu povus per siaj baskoj⁷ ion tuŝi, aŭ havigi (kion oni pleje timis) oportunun al la ŝmiristoj. Kaj krom tiu ĉi zorgo cirkuli kun kiel eble plej mallongaj kaj striktaj vestoj, estis ĉiu persono neglektata kaj ne prizorgata; longaj la barboj de tiuj, kiuj kutimis ilin surhavi; kreskintaj ĉe tiuj kiuj kutimis ilin razi; longaj kaj taŭzitaĵoj ankaŭ la kapharoj, ne nur pro la malzorgo, kiun kaŭzas longa deprimiĝo, sed pro tio ke fariĝis suspektindaj la frizoroj, post kiam estis kondamnita kiel fama ŝmiristo unu el ili, Giangiacomo Mora; nomo, kiu gardis longan fifaman renomon, sed meritis pli vastan kaj ĉiamdaŭran kompaton. Plej multaj tenis per unu mano bastonon, kelkiuj eĉ pistolon, kiel minacan averton al eventuale volantaj tromulte proksimiĝi; kaj tenis per la alia mano odorajn pastelojn, aŭ traboritajn metalajn aŭ lignajn globetojn, kun internaj spongoj trempitaj per medikamentaj vinagroj; kaj de temp' al tempo almetis ilin al la nazo, aŭ daŭre alpremis ilin tie. Iuj portis ĉe-kole boteleton da hidrargo⁸, konvinkite, ke ĝi havas la potencon sorbi kaj retenigi ĉian pestan elvapaĵon; kaj ili zorgis renovigi ĝin post certa nombro de tagoj. La nobeloj, ne nur elhejmiĝis sen la kutima akompanantaro, sed oni eĉ vidis ilin kun pajlo-korbo ĉe-brake,

⁷ *baskoj*: libere pendantaj vesto-partoj.

⁸ *hidrargo*: arĝento-simila fluida metalo (pli poste oni ĝin uzis por fabriki termometrojn).

disiri aĉeti necesajojn por manĝi. La amikoj, se hazarde du el ili renkontiĝis surstrate, salutis sin de fore, per silentaj kaj rapidaj gestoj. Ĉiu surstrate estis tre okupita eviti la naŭzajn kaj mortigajn stumbligajojn, per kiuj la grundo estis dis-ŝutita, kaj iuloke eĉ tute obstrukcita: ĉiu strebis marŝi meze de la strato, timante ke alia malpuraĵo kaj eĉ pli fatala pezaĵo⁹ eventuale falos el fenestroj; timante venenajn pulvorojn, kiujn laŭdire oni ofte deŝutis sur la pasantojn; timante la murojn eventuale ŝmiritaj. Tiumaniere la malklereco, inverse aŭdaca kaj singarda, aldonis afliktojn al afliktoj, kaj alportis falsajn terurojn, anstataŭ la raciajn kaj benefikajn singardojn, kiujn ĝi estis foriginta ĉe l' komenco.

Ĉi tia estis la aspekto de tio, kio estis malplej deforma kaj kompatinda, nome la sanuloj, la bonstatuloj: ĉar, post tiom da bildoj de malfeliĉo, kaj konsidere tion, eĉ pli aĉan, tra kio ni devos konduki la leganton, ni tute ne priskribos la spektaklon de l' pestuloj, kiuj surstrate sin trenaciis aŭ kuŝaciis, de l' malriĉuloj, de l' infanoj, de l' virinoj. Temis pri spektaklo tia, ke la rigardanto trovis kvazaŭ malesperan konsolon en tio, kio plej forte kaj ĉagrene impresas la pra-posteulojn; tio estas pensi kaj vidi ke l' transvivantoj reduktiĝis al tiel malmultaj.

Renzo jam marŝis grandan parton de sia vojo meze de tia malfeliĉego, kiam, distance kelkpaŝe de l' strato en kiun li devis sin turni, li ekaŭdis veni tiuflanke diversan bruadon, en kiu distingiĝis tiu kutima horora tintado.

Atinginte la angulon de la strato, kiu estis unu el la plej larĝaj, li vidis kvar ĉarojn haltantaj meze de ĝi; kaj kiel ĉe vendejo de grenajoj vidiĝas homoj iri-reiri, surpreni kaj renversi gren-sakojn, tia estis la movado en tiu loko: monatioj

⁹ *fatala pezaĵo*: kadavro.

enirantaj domojn, monatioj kiuj eliris kun pezaĵo surŝultre, kaj demetis ĝin sur tiun aŭ sur alian ĉaron: iuj kun ruĝa uniformo, aliaj sen tiu distingilo, multaj kun alia, eĉ pli abomeninda: diverskoloraj plumaĵoj kaj flokoj, kiujn tiuj fiuloj surportis kiel signon de gajo en tia publika funebro. Jen el unu, jen el alia fenestro aŭdiĝis funebra voĉo: «ĉi tien, monatioj!». Kaj kun eĉ pli sinistra sono, el tiu fia svarmo eliris voĉaĉo, kiu respondis: «tuj, tuj». Aliaj enloĝantoj grumblis kaj urĝis: al ili la monatioj respondis per blasfemoj.

Enirinte la straton, Renzo plirapidis, klopodante pretervidi tiujn obstaklojn, krom kiom necese por ilin eviti; kaj lian rigardon trafis speciala kompatindaĵo, kiu instigis la animon kontempli ĝin; tiel ke li ekhaltis preskaŭ senvole.

Desupris de l' sojlo de unu el tiuj pordoj, kaj venis direkte al la ĉararo, virino, kies aspekto montris maturan, sed ne forpasintan junecon; en ŝi travidiĝis beleco, kiun granda pasio kaj morto-langvoro vualis kaj malbriligis, sed ne estingis: tiu beleco samtempe dolĉa kaj majesta, kiu brilas en la sango Lombarda. Ŝia irado estis laca, sed ne falema; la okuloj ne eligis larmojn, sed montris, ke multe da ili jam estis verŝitaj; estis en tiu doloro mi ne scias kio kvietaj kaj profunda, kiu atestis animon tute viglan kaj konscian. Sed ne nur ŝia aspekto, inter tiom da malfeliĉoj, tiel speciale ŝin proponis al la kompatato, kaj revivigis rilate ŝin tiun senton jam senfortan kaj preskaŭ senvivan en la koroj. Ŝi portis surbrake knabinon eble naŭjaran, mortintan; sed tute ordigitan, kun la hararo dividita surfrunte, kun blankega vestaĵo, kvazaŭ tiuj manoj estus ornamintaj ŝin por festo promesita delonge, kaj donita premie. Kaj la virino ne ŝin tenis kuŝigita, sed subtenis sidigita surbrake, kun la brusto apogita al la brusto, kvazaŭ ŝi ankoraŭ

vivus; escepte ke unu maneto, blanka kiel vakso, flanke pendis kun senviva pezeco, kaj la kapo kuŝis sur la ŝultro de la patrino, kun sinlaso pli forta ol dormo: de la patrino, ĉar, eĉ se la simileco de l' vizaĝoj ne tion atestus, tion klare malkaŝis la mieno de tiu el la duopo, kiu ankoraŭ esprimis senton.

Fia monatio aliris por preni la knabinon el ŝiaj brakoj, sed kun speco de nekutima respekto, kun senvola hezitemo. Sed ŝi, sin retirante, sen tamen esprimi indignon aŭ malŝaton, «ne!» ŝi diris: «vi ankoraŭ ne tuŝu ŝin; mi mem demetu ŝin sur la ĉaron: prenu». Tion dirante, ŝi malfermis unu manon, montris mon-saketon, kaj faligis ĝin en tiun kiun la monatio etendis. Poste ŝi daŭrigis: «promesu, ke vi eĉ ne fadenon deprenos de ŝi, nek permesos ke aliaj aŭdacu tion fari, kaj promesu subterigi ŝin tia».

La monatio metis promese unu manon al la brusto; poste, zorgoplene, kaj kvazaŭ serveme, pli pro l' nova sento, kiu iel lin ekregis, ol pro la neatendita rekompenco, li penis disponigi sur la ĉaro liberan lokon por la eta mortintino. La patrino, kisinta ŝin surfrunte, kuŝigis ŝin tien, kvazaŭ surliten, ordigis ŝin, suretendis blankan tukon, kaj diris la lastajn vortojn: «adiaŭ, Cecilia! ripozu en paco! Ĉi-vespere venos ankaŭ ni mem, por resti ĉiam kune. Preĝu dumtempe por ni; kaj mi preĝos por vi kaj la ceteraj». Poste, sin turninte denove al la monatio, «vi mem», ŝi diris, «ĉi tie pasante ĉi-vespere, alsupros por preni ankaŭ min, kaj ne nur min».

Tion dirinte, ŝi rehejmeniĝis, kaj post nemulte ŝi aperis ĉe l' fenestro, tenante surbrake alian, pli etan knabinon, vivan, sed kun signoj de morto survizaĝe. Ŝi restis, por kontempli tian malindan sepulton de la unua, ĝis la ĉaro ekveturis, ĝis ŝi sukcesis ĝin vidi; poste ŝi malaperis. Kaj kion alian ŝi povis

fari, krom kuŝigi surliten la postrestintan knabinon, kaj kuŝiĝi apud ŝi, por morti kune? Kiel floro, prospera surtige, falas kune kun ankoraŭ burĝona floreto, ĉe l' paso de l' falĉilo, kiu ĉiujn herbejajn kreskaĵojn egaligas.

«Ho Sinjoro!» elkriis Renzo: «elaŭdu ŝin! altiru ŝin al vi, ŝin kaj ŝian etulinon: ili jam sufiĉe suferis! ili jam sufiĉe suferis!»

Post kiam li rekonsciiĝis el tiu eksterordinara emocio, dum li klopodas rememori la itineron, ĉu sin turni je la unua strato, kaj ĉu dekstren aŭ malen, ankaŭ tie li ekaŭdas alian kaj alispecan bruon, konfuzan sonon de ordono-krioj, de feblaj lamentoj, ploradon de virinoj, obtuzajn krietojn de infanoj.

Li plu iris, kun en-kore la saman malĝojan obskuran antaŭsenton. Atinginte la strat-kruĉiĝon, li vidis unuflanke konfuzan homamason venanta, kaj li ekhaltis, por lasi ĝin pasi. Temis pri malsanuloj kondukataj al la pestulejo; kelkaj, puŝate perforte, rezistis vane, vane kriis, ke ili volas morti en sia lito, kaj respondis per senutilaj sakradoj al la blasfemoj kaj komandoj de l' monatioj kiuj gvidis ilin; aliaj marŝis silente, montrante nek ĉagrenon nek alian senton, kvazaŭ sensencaj; virinoj kun infanoj surbrake; knaboj teruritaj de l' krioj, de tiuj ordonoj, de tiu kompanio, pli ol de konfuzo penso pri morto, alvokis la patrinon, ties fidindajn brakojn, kaj hejmon sian. Ho ve! Eble ilia patrino, kiun ili pensis lasita dormanta surlite, tien sin ĵetis abrupte trafita de pesto; kaj tie kuŝis senkonscia, veturigota al la pestulejo aŭ, se la ĉaro alvenos pli malfrue, al subterigo. Eble, ho malfeliĉo eĉ pli amare plorinda! la patrino, tute absorbita pri siaj suferoj, forgesis ĉion, eĉ la gefilojn, kaj nenion alian ŝi celis, krom morti en paco. Tamen, en tia konfuzo, ankoraŭ vidiĝis ekzemploj de firmeco kaj kompatato:

patroj, patrinoj, fratoj, filoj, edzoj aŭ edzinoj, kiuj subtenis siajn karulojn, kaj akompanis ilin per konsolaj vortoj: kaj ne nur plenkreskuloj, sed eĉ knabetoj, eĉ kanbinoj, kiuj gvidis pli etajn fratetojn, kaj kun plenkreskulaj prudento kaj kompato al ili rekomendis obeemon, kaj certigis ilin ke oni iras en lokon, kie oni ilin flegos por resanigi ilin.

Tra l' melankolio kaj tenereco de tiaj vidaĵoj, unu afero plej vive tuŝis kaj ekscitis nian vojaĝanton. La serĉata domo certe estis tute proksima, kaj do eble, inter tiuj homoj... Sed kiam la grupo forpasis, kaj tiu dubo ĉesis, li sin turnis al postvenanta monatio, kaj lin demandis pri la strato kaj domo de Don Ferrante. «Mortaĉu, fiulo», estis la respondo, kiun li ricevis. Li tute ne zorgis rebati laŭmerite; sed, vidinte, du paŝojn distance, komisaron, kiu postsekvis la grupon, kaj ŝajne havis pli kristanan vizaĝon, li faris al li la saman demandon. Tiu, indikante per bastono la direkton, de kie li venis, diris: «la unua strato dekstren, la lasta domo maldekstre».

Kun nova kaj pli forta anxio en-kore, la junulo sin direktas tien. Li atingas tiun straton; li tuj distingas la domon inter l' aliaj, pli malaltaj kaj modestaj; li proksimiĝas al la pordego, kiu estas fermita, li metas sur la frapilo la manon, kaj tenas ĝin levita, kvazaŭ en lotujo, antaŭ ol preni la sort-bileton, sur kiu skribita estas lia vivo aŭ lia morto. Fine li levas la frapilon, kaj batas per rezoluta frapeto la pordon. Post momento malfermetiĝas fenestro; virino elkliniĝas, rigardante, kiu do estas, kun suspektema mieno, kiu ŝajnas diri: ĉu monatioj? vagabondoj? komisaroj? ŝmiristoj? diabloj?

«Ho sinjorino», diris Renzo supren rigardante, kun voĉo ne tute firma, «ĉu loĝas ĉi tie kiel servantino kamparana junulino, nome Lucia?».

«Ne plu estas ĉi tie; foriru», respondis tiu virino, ekfermante.

«Momenton, karitate! Ĉu ŝi ne plu estas ĉi tie? Kie ŝi estas?». «En la pestulejo»; kaj ŝi denove volus fermi.

«Sed momenton, pro Ĉiel-amo! Ĉu kun pesto?». «Jes ja. Tio estas novaĵo, ĉu? Foriru».

«Ho ve al mi! Atendu: ĉu ŝi grave malsanis? Ek de kiom da tempo...?».

Sed dume la fenestro estis efektive fermita.

«Ho sinjorino! ho sinjorino! unu vorton, karitate! pro viaj povraj mortintoj! Mi nenion petas el viaj havaĵoj: ho-he!». Sed estis kvazaŭ paroli al muro.

Afliktita pro la sciigo, kaj kolera pro la maniero, Renzo kaptis denove la frapilon, kaj, tiel apogita al la pordego, li premis kaj tordis ĝin, kaj li levis ĝin por frapi denove malespere, kaj poste li tenis ĝin levita. En tia ekscitiĝo, li sin turnis, por vidi, ĉu troviĝas najbaro, el kiu ricevi pli precizan informon, indicon, lumon. Sed la unua, ununura persono, kiun li vidis, estis alia virino, distanca eble dudek paŝojn; kiu, kun vizaĝo esprimanta teruron, malamon, malpaciencon kaj malicon, kun iel strabigitaj okuloj, strebantaj samtempe rigardi lin kaj foren, malfermegante la buŝon, kvazaŭ por kriegi plejrove, sed retenante eĉ la spiron, levante du senkarnajn brakojn, etendante kaj retirante la faltajn manojn, kurbigitajn kvazaŭ ungegojn, kvazaŭ ŝi strebus ion kapti, evidentis, ke ŝi volas helpo-krii, sed tiamaniere ke iu ne tion rimarku. Kiam iliaj rigardoj renkontiĝis, ŝi, fariĝinte eĉ pli malgracia, skuiĝis, kvazaŭ surprizita homo.

«Kio diable...?» komencis Renzo, levante ankaŭ li mem la manojn direkte al la virino; sed ĉi-lasto, perdinte la esperon

kaptigi lin neatendite, ellasis la krion ĝis tiam retenitan: «la ŝmiriston! batu! batu! batu la ŝmiriston!».

«Kio? ĉu mi! ha mensogema sorĉistino, silentu», kriis Renzo; kaj li alsaltis al ŝi, por ŝin teruri kaj kvietigi. Sed tuj li ekvidis, ke li pli bezonas prizorgi sian aferon. Ĉe l' kriado de l' oldulino, amasiĝis homoj ambaŭflanke; ne tiel multnombraj, kiom estus, se tiaĵo okazus antaŭ tri monatoj; sed pli ol sufiĉe por aranĝaĉi laŭplaĉe unu solan viron. Samtempe malfermiĝis denove la fenestro, kaj tiu sama malafabla virino ĉi-foje elŝovis la kapon, kaj ankaŭ ŝi mem kriadis: «kaptu lin, kaptu lin; certe li estas unu el la kanajloj, kiuj vagabondas por ŝmiri pordojn de honestuloj».

Renzo ne restis enpena: al li tuj ŝajnis pli konvene liberiĝi de ili, ol resti por prezenti siajn praviĝojn: li rigardis dekstren kaj malen, kie do estas malpli da homoj, kaj tra tie li eskapis. Li repuŝis per skuego viron, kiu al li baris la vojon; per forta pugno surbrusten li repelis distancen ok aŭ dek paŝojn alian, kiu kuris kontraŭ lin; kaj for tute galope, kun levita, premita, malmola pugno, preta bati ĉiun alian, kiu eventuale trafus inter liajn piedojn. La strato antaŭ li plu estis libera; sed dorse li aŭdis la piedbruon, kaj, pli fortaj ol la piedbruo, tiujn sinistrajn kriojn: «batu! batu! la ŝmiriston!». Li ne sciis, kiam do ili haltos; nek vidis, kien eskapi. La kolero fariĝis rabio; la angoro ŝanĝiĝis al malespero; kaj, perdinte la prudenton, li metis la manon al sia tranĉilaĉo, eligis ĝin, subite haltis, returnis mienon pli straban kaj minacan ol iam ajn en sia vivo; kaj, kun etendita brako, alte svingante la brilan klingon, li kriis: «kiu kuraĝas, tiu venu, kanajlo! kaj mi vere ŝmiros lin per tio ĉi».

Sed, kun miro kaj konfuza konsolo, li ekvidis, ke liaj

persekutantoj jam haltis, kaj tie restis kvazaŭ hezite, kaj, plu kriegante, ili, kvazaŭ obsedate, faris kun levitaj manoj signojn, kvazaŭ al homoj de malproksime venantaj liadorsen. Li denove sin turnis, kaj li ekvidis (ĉar la granda perturbo malebligis vidi ĝin antaŭe) veni ĉaron, kaj eĉ vicon da tiaj kutimaj funebraj ĉaroj, kun la kutima akompano; kaj, iom pli distance, alian grupeton da homoj same volantaj ĉasi la ŝmiriston, kaj lin kapti meze; sed ilin malhelpis tiu sama obstaklo. Vidante sin kaptita inter du fajroj, li ekpensis, ke tio kio estas al ili plej terura, povas esti al li sava; li pensis ke nun ne estas oportune delikatumi, li remetis la tranĉilaĉon en la ingon, li flankiĝis, li elanis¹⁰ al la ĉaroj, preterpasis la unuan, li ekvidis sur la dua liberan spacon. Li ĝin celas, li eksaltas; li estas sur ĝi, plantite sur la dekstra piedo, kun la maldekstra en-aere, kaj kun levitaj brakoj.

«Brave! brave!» elkriis unuvoĉe la monatioj, el kiuj kelke sekvis la ĉar-vicon piede, aliaj sidis sur la ĉaroj, aliaj, por diri la hororaĵon objektive, sur la kadavroj, trinkegante el dika flasko, kiu pasis de mano al mano. «Brave! bela lertaĵo!».

«Vi venis meti vin sub la protekton de l' monatioj; taksu, kvazaŭ vi estus en preĝejo», al li diris unu el la du sidantaj sur la ĉaro, kien li sursaltis.

La malamikoj, ĉe l' proksimiĝo de l' ĉaro-vico, plejparte jam turnis la dorsojn, kaj foriris, tamen plu kriante: «batu! batu! la ŝmiriston!». Kelkiu retiriĝis malpli rapide, haltetante de temp' al tempo, kaj sin turnante, kun mienaĉoj kaj minacaj gestoj direkte al Renzo; kiu el la ĉaro, al ili respondis disbatante pugnojn en-aere.

«Lasu al mi la aferon», al li diris iu monatio; kaj, deŝirinte

¹⁰ *elanis*: svingis sin antaŭen, por salti.

de sur kadavro malpuraĉan ĉifonon, li rapide nodigis ĝin, kaj, kaptinte ĝin je unu el la ekstremaĵoj, li levis ĝin rotacie kvazaŭ ŝton-ĵetilon direkte al tiuj obstinuloj, kaj ŝajnis ke li intencas ĝin ĵeti, kriante «atendu, kanajloj!». Ĉe tiu gesto, ĉiuj forkuris hororinte; kaj Renzo vidis nur malamikajn dorsojn, kaj kalkanojn rapide suprendancantaj, kvazaŭ marteloj de fulistoj¹¹.

Elinter la monatioj leviĝis triumfa kriado, tempesto-brua ridego, longa «hu-u!», kvazaŭ por akompani tiun fuĝadon.

«Ha ha! vi vidas, ĉu ni kapablas protekti honestulojn?» diris al Renzo tiu monatio: «pli bravas unu el ni ol cent el tiuj nenifaruloj».

«Certe, mi povas diri, ke mi al vi ŝuldas mian vivon», respondis Renzo: «kaj mi vin dankas el la tuta koro».

«Pri kio dankinde?» diris la monatio: «vi tion meritas: evidentas ke vi estas bonmora junulo. Vi prave faras, ŝmirante tiun kanajlaron; ŝmiru, ekstermu ilin, kiuj nenion valoras, krom kiam ili mortis; kiuj rekompence al nia penega vivo-maniero, nin malbenas, kaj diraĉas, ke kiam finiĝos la mortado, ili intencas pendumi nin ĉiujn. Sed ili mem devas fin-morti antaŭ ol finiĝos la mortado; kaj la monatioj devas resti solaj, por triumfadi kaj diboĉaĉi tra Milano».

«Vivu la mortado kaj mortu la popolaĉo!» elkriis la alia; kaj, kun tiu ĉi bela tosto, li albuŝigis la flaskon, kaj, tenante ĝin ambaŭ-mane li, skuante de l' ĉaro, trinkegis glutegon, kaj poste li proponis ĝin al Renzo, dirante: «trinku je nia sano».

«Tut-elkore mi ĝin deziras al vi», diris Renzo: «sed mi ne soifas; mi tute ne emas trinki en tiu ĉi momento».

¹¹ *fulistoj*: fabrikistoj de felto, t.e. dika ŝtofo ne el teksitaj fadenoj, sed el haroj aŭ fibroj kunpremitaj per batado.

«Vi travivis aĉan timegon, al mi ŝajnas», diris la monatio: «laŭ mi vi aspektas povrulaĉe; nepras havi tute alian mienon, por esti ŝmiristo».

«Ĉiu klopodas laŭpove», diris la alia.

«Transigu ĝin al mi», diris unu el tiuj kiuj piede akompanis la ĉaron, «ĉar ankaŭ mi mem volas trinki alian gluton, je la sano de ĝia mastro, kiu kuŝas ĉi tie, en ĉi bela kompanio... tie, ĝuste tie, al mi ŝajnas, en tiu bela ĉar-pleno».

Kaj, kun iel kruela kaj kanajla ridaĉo, li montraĉis la ĉaron antaŭ tiu, sur kiu sidis la povra Renzo. Poste, afektante pli strabaĉan kaj perfidan seriozecon, li riverencis tiudirekte, kaj daŭrigis: «ĉu vi kompleksas, mastro mia, ke povra monatieto gustumu el enhavo de via kelo? Vi ja vidas: ni faras tian vivaĉon: ni mem enkaleŝigis vin, por vin konduki al somerumo. Kaj krome estas konate, ke la vino tuj misfartigas vin, la senjorojn: male la povraj monatioj havas fortikan stomakon».

Kaj inter ridegoj de l' kompanoj, li prenis la flaskon, kaj ĝin levis; sed, antaŭ ol trinki, li sin turnis al Renzo, fiksrigardis lian vizaĝon, kaj al li diris kun esprimo de malŝatoplena kompato: «la diablo, kun kiu vi paktis¹², nepre estas tute juna; ĉar, se ne savus vin ni mem, li tute nenian helpon al vi donus». Kaj ĉe novaj bruaĉaj ridegoj, li alkroĉis la flaskon al la lipoj.

«Kaj kio al ni? he! kio al ni?» kriis pluraj voĉoj el la antaŭa ĉaro. La fripono, trinkeginte kiom-vole, prezentis per ambaŭ manoj la dikan flaskon al tiuj kolegaĉoj, kiuj transigis ĝin de unu al alia, ĝis unu, kiu, malpleniginte ĝin, kaptis ĝin je

¹² *paktis*: oni supozis, ke monatioj, same kiel sorĉistoj kaj magiistoj, faris pakton kun diabloj, por sukcesi en siaj malicaj faroj.

la kolo, rotacie svingis kaj ĵetegis ĝin frakasiĝi sur la grundaj ŝton-platoj, kriante: «vivu la mortado!». Post tiuj vortoj, li ekkantis monatian fi-kanzonon; kaj tuj lian voĉon akompanis ĉiuj aliaj el tiu fia ĥoro. La infera kantilenaĉo, miksita kun la sono de l' tintiloj, la grincado de l' ĉaroj, la paŝbruo de l' ĉevaloj, resonis en la silenta malpleno de l' stratoj, kaj, reĥante en la domoj, amare korpemis la malmultajn kiuj ankoraŭ tie loĝis.

Sed kio do ne povas foje fariĝi oportuna? kio do ne povus iu-kaze estigi plezuron? La ĵusa danĝero igis al Renzo pli ol tolerebla la fi-societon de tiaj mortintoj kaj vivantoj; kaj tiu-momente impresis, mi dirus, agrable je liaj oreloj tiu muziko, kiu elturnis lin el la impliko de tia konversacio. Ankoraŭ **duon-anhela** kaj tute konsternita, li dume dankis laŭpove en sia koro la Dian Providencon, ke li eskapis el tia kriza situacio, ne farante nek ricevante malbonon; li nun ĝin preĝis helpi lin liberiĝi el liaj liberigantoj; kaj sia-flanke li viglis, rigardis ilin, rigardis la straton, por kapti la oportunon degliti tute kviete, evitante ke ili faru bruon, aŭ skandalon, kiu impresus malice la pasantojn.

Subite, ĉe strat-angulo, al li ŝajnis ke li rekonas la lokon: li rigardis pli atente: li certiĝis. Ĉu vi scias, kie li estis? Sur la aleo de la Orienta pordego, en tiu sama strato, tra kiu li malrapide venis kaj tut-rapide forkuris antaŭ ĉirkaŭ dudek monatoj. Li tuj rememoris ke tra tie oni iras rekte al la pestulejo; kaj tion, ke li troviĝas sur la ĝusta vojo, sen esplori, nek demandi, li taksis kiel specialan helpon de la Dia Providenco, kaj kiel aferon esperigan por la estonto. Ĝuste tie venis renkonte al la ĉaroj komisaro, kri-ordonante al la monatioj ek-halti, kaj mi ne scias kio alia: fakte la ĉararo

haltis, kaj la muziko ŝanĝiĝis al brua diskuto. Unu el la monatioj sidantaj kun Renzo sur-ĉare desaltis: Renzo diris al la alia: «mi dankas vin pro via karitato: Dio vin rekompencu laŭmerite»; kaj desaltis ankaŭ li mem, aliflanken.

«Iru, iru, povra ŝmiristeto», tiu respondis: «ne estas vi la homo, kiu renversos Milanon».

Bonŝance neniu aŭdanto ĉeestis. La ĉararo haltis ĉe la maldekstra flanko de la aleo: Renzo tuj sin direktas aliflanken, kaj tuŝe al la muro plu-trotas al la ponto; li transiras ĝin, li pluiras la kvartalan straton, li rekonas la kapucenejon, li proksimas al la pordego, ekvidas la angulon de la pestulejo, li trairas la krad-pordon, kaj antaŭ liaj okuloj plenkampas la ekstera scenejo de tiu baraĵo: apenaŭ indico kaj specimeno, sed jam vasta, varia, ne-priskribebla sceno.

Laŭ la du flankoj el tiu punkto videblaj, vidiĝis tuta svarmado: malsanuloj enirantaj grupope en la pestulejon; aliaj sidantaj aŭ kuŝantaj sur la bordoj de la fosaĵo, kiu randas ĝin; ĉu pro tio ke mankis la fortoj por atingi la internon, ĉu ĉar, elirinte de tie pro malespero, same mankis fortoj por plu-iri. Aliaj mizeruloj vagadis sencelaj, kvazaŭ stuporaj, kaj ne malmultaj tute frenezaj; unu tute fervore rakontadis siajn imagaĵojn al malfeliĉulo kuŝanta premate de l' malsano; alia deliris; alia rigardis ĉi tien kaj tien kun ridanta vizaĝeto, kvazaŭ li rigardus gajan spektaklon. Sed pli stranga kaj pli brua speco de tia malfeliĉa gajeco, estis laŭta kaj daŭra kanto, kiu ŝajnis ne deveni el tiu kompatinda hom-amaso, kaj tamen aŭdigis sin pli laŭte ol ceteraj voĉoj: kampula kanzono pri gaja kaj ŝerca amoro, el tiuj kiujn oni nomis *villanella*-kantoj; li per la rigardo sekvis la sonon, por malkovri, kiu do povus kontenti tiutempe, tiuloke, ĝis vidiĝis mizerulo kiu, trankvile sidante

funde de l' fosaĵo, kantis plej-pove, kun tute levita kapo.

Renzo, farinte apenaŭ kelke da paŝoj laŭ la suda flanko de la konstruaĵo, ekaŭdis en tiu popol-amaso eksterordinaran bruon, kaj forajn voĉojn krientaj: rigardu! kaptu! Li sin levas pied-pinte, kaj ekvidas ĉevalaĉon kureganta, spronate de pli stranga rajdanto: temis pri frenezulo, kiu, vidinte apud ĉaro tiun beston malligita kaj ne gardata, ekrajdis ĝin sen-sela, kaj, martelante ties kolon per pugnoj, kaj spronumante per kalkanoj, kuregigis ĝin; kaj la monatioj post lin, kriegante; kaj ĉio involviĝis en polvo-nubo, kiu foren flugis.

Tiele, jam konsternita kaj laca vidi mizerojn, la junulo atingis la pordegon de tiu loko, kie estis amasigite da ili eble pli multe ol kiom troviĝis dise en la longa spaco, kiun li jam devis tramarŝi. Li aliras tiun pordegon, eniras sub la volbon, kaj momente haltas senmove, meze de la portiko.

La leganto imagu la pestulejon ĉirkaŭ-barita, loĝata de dek ses mil pestuloj; tiun spacon tute okupita jen per kabanoj kaj barakoj, jen per ĉaroj, jen per hom-grupoj; tiujn du senfinajn vicojn de portikoj, dekstre kaj male, plenaj, plenegaj de miksitaj pereantoj kaj kadavroj, sur matracaĉoj aŭ sur pajlo; kaj en tiu tuta senmezura sovaĝ-bestejo, svarmadon, kvazaŭ ondadon; ie kaj tie iron-reiron, haltadon, kuradon, kliniĝon, leviĝon de konvaleskantoj, frenezuloj, flegantoj. Tia estis la spektaklo kiu subite plenigis la okulojn de Renzo, kaj haltigis lin obsedita kaj absorbita. Tiun ĉi spektaklon ni tute ne intencas priskribi detale, nek la leganto tion deziras; nur, sekvante nian junulon en ties dolora vagado, ni haltos ĉe liaj haltoj, kaj el tio kion li devis vidi, ni diros nur kiom necesas, por rakonti kion li faris, kaj kio postsekvis.

El la pordego, kie li haltis, ĝis la kapelo situanta meze, kaj de tie ĝis la kontraŭa pordego, estis speco de aleo sen kabanoj aŭ alia stabila obstrukcaĵo; kaj ĉe l' dua rigardo, Renzo vidis en tiu aleo baraktadon de ĉaroj, forigon de objektoj, por liberigi spacon; li vidis kapucenojn kaj laikojn gvidi tion, kaj samtempe forpeli eventualajn ne-koncernatojn. Kaj timante esti mem sammaniere forsendota, li tuj sin ŝovis inter la kabanojn, ĉe l' dekstra flanko, kien li estis hazarde turnita.

Li pluiris, laŭ tio, ke li vidis lokon trapaseblan, de kabano al kabano, enŝovante la kapon en ĉiun el ili, kaj observante la eksterajn, subĉielajn litojn, esplorante vizaĝojn deprimitajn de l' suferoj aŭ kuntiritaj pro l' dolorego, aŭ senmovaj en la morto, ĉu li trovos tiun, kiun li tamen timis trovi. Sed li jam trairis sufiĉe longan vojon, kaj jam ripetis plurfoje tiun doloran esploron, vidante nenian virinon: el kio li imagis, ke

ili certe troviĝas aparte. Kaj li divenis; sed kie do ili estas, li indicon ne havis, nek povis konjekti. De temp' al tempo li renkontis servantojn, tiom diversajn laŭ aspekto, manieroj kaj vesto, kiom diversa kaj mala estis la principo, kiu donis al ambaŭ egalan forton por vivi en tiu servado: ĉe unuj malapero de ĉia kompat-sento, ĉe la aliaj super-homa kompatemo. Sed Renzo aŭdacis nek unujn nek aliajn pridemandi, por eviti eventualan malhelpaĵon; kaj li decidis plu kaj plu iri, ĝis li sukcesos trovi virinojn. Kaj plu irante li daŭre ĉirkaŭ-gvatis; sed de tempo al tempo li devis deturni la rigardon afliktitan kaj kvazaŭ blindigitan de tiom da plagoj. Sed kien ĝin turni, kie ĝin kvietigi, krom super aliaj plagoj?

Eĉ la aero kaj la ĉielo pliakrigus, se tio eblus, la hororon de tiuj vidaĵoj. La nebulo iom post iom plidensiĝis kaj amasiĝis, formante nubegojn, kiuj, pli kaj pli malhelaj, donis impreson de tempesta noktiĝo; tamen, preskaŭ meze de tiu sombra kaj malalta ĉielo, vidiĝis, kvazaŭ tra densa vualo, la sun-disko, pala, kiu disradiis ĉirkaŭ si feblan, apenaŭan duonlumon, kaj desuprigis mortan kaj pezan varmon. De temp' al tempo, tra l' daŭra zumado de tiu konfuza homaro, aŭdiĝis profunda, kvazaŭ stumpa, ne rezoluta grumblado de tondroj; kaj, streĉante orelojn, vi ne povus distingi de kiu flanko ĝi devenas; aŭ vi povus kredi ĝin fora kurado de ĉaroj, kiuj subite haltas. Ne vidiĝis, en la ĉirkaŭaj kamparoj, arbo-branĉo moviĝi, nek birdo al ĝi flugi, aŭ de ĝi leviĝi: nur la hirundo, aperante subite super la tegmento de la barilo, deglisis kun etenditaj flugiloj, preskaŭ ĝis tuŝe al la kampgrundo; sed, terurite de tiu svarmetado, ĝi rapide re-supris kaj fuĝis. Estis vetero tia, kiam en societo de vojaĝantoj neniu rompas la silenton; kaj la ĉasisto marŝas enpena, kun la

rigardo teren; kaj la kampulino, pioĉante en kampo, senkonscie ĉesas kantadon; el tiaj tempest-anoncaj veteroj, en kiuj la naturo, kvazaŭ senmova ekstere, agitate de interna turmento, ŝajnas premi ĉian vivanton, kaj aldoni ian penon al ĉiu ajn faro, al neni-farado, al la ekzisto mem. Sed en tiu loko, per si mem destinita al suferado kaj mortado, oni vidis la homojn, jam baraktantajn kun la morbo, perej sub tiu nova premado; oni vidis centojn kaj centojn da ili rapidege pli-aĉiĝi; kaj samtempe la lasta batalo estis pli anhela, kaj, ĉe l' pliiĝo de l' doloroj, la ĝemoj pli sufokitaj; eble neniam antaŭe, en tia dolorejo, pasis horo tiel same kruela.

La junulo vagis jam longe kaj senfrukte tra tiu labirinto el kabanjoj, kiam, inter la variaj lamentoj kaj la konfuza murmurado, li komencis distingi miksaĵon el infan-krietoj kaj kapro-blekoj; fine li atingis breĉetitan kaj mis-kunigitan tabul-barajon, el kies interno devenis tiu neordinara sono. Li aligis okulon al larĝa fendeto inter du tabuloj, kaj li vidis interne de ĉirkaŭbarilo disajn kabanjojn, kaj ĉu en ili, ĉu subĉiele, ne la kutiman malsanularon, sed infanetojn, kuŝantajn sur matracetoj, aŭ sur kusenoj, aŭ sur etenditaj littukoj, aŭ sur dik-tukaĵoj; kaj mamnutristinojn kaj aliajn laborantinojn, kaj, tion kio plimulte altiris kaj atentigis la rigardon, kaprinojn miksitajn kun la virinoj, kaj rolantajn kiel ties helpantinoj: temis pri beb-hospitalo, kian la loko kaj la epoko ebligis. Estis kurioze, vidi kelke el tiuj bestoj stari kviete super ĉi tiu kaj tiu infano, kaj prezenti al ĝi la mamon; kaj alian alrapidi ĉe infan-ploreto, kvazaŭ kun patrina sento, kaj ekhalti apud la eta nutroto, kaj klopodi adapti sin super ĝi, kaj bleki kaj barakti, kvazaŭ vokante ke oni venu helpe al ambaŭ.

Ie kaj tie sidis mamnutristinoj kun infanoj ĉe-bruste; iuj

en tiel amema teniĝo, ke ili dubigis la rigardanton, ĉu ilin tien logis la salajro, aŭ tia elkora karitato kiu serĉas bezonojn kaj dolorojn por helpi. Unu el ili, tute dolorplena, deigis de sia elĉerpita mammo povran plorantan etulon, kaj malĝoje serĉis beston, kiu povus anstataŭi ŝin. Alia rigardis kun plezuriĝo la bebon endormiĝintan ĉe ŝia mammo, delikate ĝin kisis, kaj eniris kabanon por ĝin kuŝigi sur matraceton. Sed la tria, havigante la ĉe-bruston al fremda suĉ-infano, kun mieno ne malzorga, sed malkvieta, fiks-rigardis la ĉielon: pri kio do ŝi pensis, kun tiaj gesto kaj rigardo, krom pri la naskito el ŝia sino, kiu eble antaŭ nemulte tiun bruston suĉis, kaj eble tie formortis? Aliaj pli aĝaj virinoj prizorgis aliajn servojn. Unu alrapidis al malsata infano, prenis ĝin, portis ĝin al kaprino paŝtiĝanta ĉe amaso da freŝa herbo, kaj prezentis ĝin al ties mammoj, kriante kontraŭ la ne-sperta bruto, kaj samtempe karesante ĝin, por ke ĝi delikate disponigu sin al tiu tasko. Alia kuris al povruleto, kiun tretis per unu piedo kaprino, tute okupita ĉe mamnutro de alia infano; tria virino disportis sian infanon, lulante ĝin, klopodante jen dormigi ĝin per kanto, jen kvietigi ĝin per dolĉaj vortoj, vokante ĝin per la nomo, kiun ŝi mem elpensis por ĝi. Alvenis tiu-momente kapuceno kun blankega barbo, portante sur la du brakoj du plorantajn bebojn tiam trovitajn apud la ĵus mortintaj patrinoj; kaj virino alrapidis por ilin akcepti, kaj ŝi esploris en la virinaro kaj la grego, por tuj trovi anstataŭanton de la patrino.

Pli ol unufoje la junulo, instigite de la unua kaj plej forta el siaj pensoj, deiĝis de la baril-fendo, por foriri; kaj poste li denove aligis la okulon, por ankoraŭ momente rigardi.

Fine, deirinte de tie, li marŝis laŭ la barilo, ĝis lin devigis turniĝi amaseto da kabanaj tuŝoj al la barilo mem. Tiam li

randiris ilin, kun la intenco reproksimiĝi al la tabularo, marŝi ĝis ties fino, kaj malkovri novan regionon. Nu, dum li rigardis antaŭen, por esplori la vojon, jen subita, momenta apero trafis lian rigardon kaj tute agitis lian animon. Distance ĉirkaŭ cent paŝojn, li ekvidis pasi kaj tuj forperdiĝi inter la barakoj kapucenon: kapucenon kiu, eĉ tiel fore kaj tiel fulmrapide, tute havis la ir-manieron, la far-manieron, la formon de patro Cristoforo. Kun la anxio, kiun vi povas imagi, li ekkuris tiudirekten; kaj tie li vagis, li serĉis, antaŭe, malantaŭe, interne, ekstere, en tiuj zigzagaj vojoj, ĝis li revidis, kun sama ĝojo, tiun formon, tiun saman fraton; li vidis lin ne fore, deiri de kaldronego, kaj iri kun taso enmane al kabano; poste li vidis lin sidiĝi ĉe ties pordo, fari kruco-signon super la taso, kiun li tenis antaŭ si; kaj ekmanĝi, ĉirkaŭrigardante, kvazaŭ daŭre vigla homo. Temis ĝuste pri patro Cristoforo.

Ties historio, ek de kiam li malaperis el nia rigardo, ĝis tiu renkonto, estos per malmulte da vortoj rakontita. Li tute ne lasis la urbon Rimini, nek pensis ĝin lasi, krom kiam la pesto estiĝinta en Milano havigis al li la oportunon, kiun li daŭre deziris: oferi sian vivon por la proksimulo. Li petis insistege, ke oni tien revoku lin, por asisti kaj servi la pestulojn. La onklo grafo jam mortis; kaj cetere oni tiam pli bezonis flegistojn ol politikistojn; tiel ke li estis elaŭdita sen malfacilaĵoj. Li tuj venis al Milano; li eniris la pestulejon; kaj tie li vivis ĉirkaŭ tri monatojn.

Sed la konsolo de Renzo pro tio, ke li retrovis la bonan fraton, eĉ ne tiumomente estis tuteca: ĝuste ĉe l' certiĝo pri lia identeco, li devis konstati, kiom multe li ŝanĝiĝis. La persono kurba kaj malfirma; la vizaĝo senkarna kaj pala; kaj entute vidiĝis elĉerpita kompleksio, karno senforta kaj kaduka, kiun

Ĉiumomente helpis kaj subtenis spirita klopodo.

Ankaŭ li mem fiks-rigardis la venantan junulon, kiu, per gesto, ne aŭdacante pervoĉe, klopodis distingi kaj rekonigi sin. «Ho patro Cristoforo!» li diris pli poste, kiam li estis tiom proksima, ke li povis aŭdigi sin ne laŭtigante la voĉon.

«Ĉu vi, ĉi tie!» diris la frato, metante la tason surgrunden, kaj levante sin el-side.

«Kiel vi fartas, patro? kiel vi fartas?». «Pli bone ol multe da mizeruloj, kiujn vi vidas ĉi tie», respondis la frato: kaj lia voĉo estis febla, obtuza, ŝanĝita, kiel la tuta cetero. Nur la okulo estis kiel antaŭe, kaj vidiĝis en ĝi io pli viva kaj brila; kvazaŭ la karitato, sublimiĝinte kulmine de sia agado, kaj jubilante, ke ĝi sentas sin pli proksima al sia fonto,¹ ekscitus fajron pli arda kaj pura ol tiu kiun la kadukeco iom post iom estingadis.

«Sed vi», li daŭrigis, «kial vi estas ĉi tie? Kial vi venas ĉi tien alfronti la peston?». «Mi estas eks-pestulo, dank' al Dio. Mi venas... serĉi pri... Lucia».

«Lucia! ĉu Lucia estas ĉi tie?». «Ŝi estas ĉi tie: mi almenaŭ esperas je Dio, ke ŝi ankoraŭ ĉeestas».

«Ĉu ŝi estas via edzino?». «Ho kara patro! tute ne, mia edzino ŝi ne estas. Ĉu vi nenion scias pri ĉio kio okazis?». «Ne, fileto: de post kiam Dio forigis min de vi, mi nenion plu eksciis; sed nun, ĉar Li al mi vin sendas, mi diras veron, ke mi deziregas pri tio sciiĝi. Kaj kio pri la ekzilo?». «Ĉu vi do scias, kion oni al mi faris?». «Sed kion faris vi mem?». «Aŭskultu; se mi dirus, ke en tiu tago en Milano mi kondukis saĝe, mi dirus mensogon; sed malbonfarojn mi tute ne faris».

¹ Patro Cristoforo, tiel kaduka, estis proksima al la morto, tio estas (laŭ la kristana kredo) al Dio, fonto de karitato (= amo).

«Mi tion kredas, kaj kredis eĉ antaŭe».

«Nun do mi povos rakonti al vi ĉion».

«Atendu», diris la frato; kaj elirinte kelk-paŝe ekster la kabano, li vokis: «patro Vittore!». Post kelke da momentoj aperis juna kapuceno, al kiu li diris: «Faru al mi jenan karitaton, patro Vittore: gardi tiujn ĉi niajn povrulojn ankaŭ anstataŭ mi, dum mi restas aparte; se tamen iu volus min mem, voku min. Precipe tiu viro! se li eventuale donus eĉ plej etan signon de rekonsciiĝo, avizu min tuj, pro karitato».

«Ne dubu», respondis la junulo; kaj la maljunulo, reveninte al Renzo, «ni eniru ĉi tien», al li diris. «Sed...» li tuj aldonis, ekhaltante, «vi al mi ŝajnas ja elĉerpita: vi certe bezonas manĝi».

«Tio estas vero», diris Renzo: «nun, ĉar vi atentigas min, mi memoras, ke mi ankoraŭ fastas».

«Atendu», diris la frato; kaj, preninte alian tason, li iris ĝin plenigi el la kaldronego: reveninte, li donis ĝin, kun kulero, al Renzo; li sidigis lin sur pajlo-sakon, kiu al li rolis kiel lito; poste li iris al barelo staranta en angulo, kaj li elkranis glason da vino, kiun li metis sur etan tablon antaŭ sia gasto; poste li reprenis sian tason, kaj sidiĝis liaflanke.

«Ho patro Cristoforo!» diris Renzo: «ĉu vi mem devas fari ĉi tiaĵon? Sed vi ja ĉiam estas la sama. Mi dankas vin tut-elkore».

«Ne danku min», diris la frato: «ĝi estas havaĵo de l' malriĉuloj; sed ankaŭ vi estas malriĉulo ĉi-momente. Nun diru al mi tion kion mi ne scias, diru al mi pri tiu nia povrulino; kaj strebu rapidi; ĉar estas malmulte da tempo; kaj multe por fari, kiel vi vidas».

Renzo, intermetante kuler-plenojn, komencis rakonti la

historion pri Lucia: kiel ŝi estis rifuĝigita en la monakinejo de Monza, kiel ŝi estis forkaptita... Ĉe l' ideo de tiaj suferoj kaj danĝeroj, ĉe l' penso ke li mem adresis al tiu loko la povran senkulpulinon, la bona frato restis kvazaŭ sen spiro; sed li tuj denove spiris, aŭdante kiel ŝi estis mirinde liberigita, redonita al la patrino, kaj de ĉi-lastata loĝigita ĉe Damo Prasede.

«Nun mi rakontos pri mi», daŭrigis Renzo; kaj li rakontis koncize la tagon en Milano, la forkuron; kiel li restis daŭre for de hejmo, kaj nun, ĉar ĉio estas renversita, li aŭdacis iri tien; kiel li ne trovis Agnese-n; kiel en Milano li eksciis ke Lucia estas en la pestulejo. «Kaj mi estas ĉi tie», li finis la rakonton, «mi estas ĉi tie por ŝin serĉi, por vidi, ĉu ŝi vivas, kaj ĉu ŝi... ankoraŭ volas min edzigi... ĉar... foje...». «Sed», demandis la frato, «ĉu vi havas indicon, kie do ŝi estas loĝigita kaj kiam ŝi venis ĉi tien?». «Tute nenion, kara patro, tute nenion, krom ke ŝi estas ĉi tie, almenaŭ se ŝi vere ĉeestas: tion volu Dio!». «Ho povruleto! sed kiajn traserĉojn ĝis nun vi faris ĉi tie?». «Mi vagis kaj revagis; sed, interalie, mi vidis preskaŭ nur virojn. Mi ja imagis, ke verŝajne virinoj estas en aparta loko, sed mi ne sukcesis trafi ĝin: se tiel statas la afero, vi nun indikos ĝin al mi».

«Ĉu vi ne scias, fileto, ke eniri tien estas permesate nur al viroj speciale komisiitaj?».

«Kio do povus min trafi?». «La regulo estas prava kaj sankta, kara fileto; kaj se la kvanto kaj graveco de l' malfeliĉoj malebligas ties rigoran plenumon, ĉu tio estas prava motivo, por ke honestulo malobservu ĝin?».

«Sed, patro Cristoforo!» diris Renzo: «Lucia devus jam esti mia edzino; vi ja scias, kiel ni estis disigitaj; dum jam dudek monatoj mi suferas, kaj pacienas; mi venis ĉi tien, kun

tiom da riskoj, unu pli aĉa ol alia, kaj nun...». «Mi ne scias kion diri», reparolis la frato, respondante al siaj pensoj, pli ol al la vortoj de la junulo: «vi tien iras bonintence; kaj plaĉu al Dio, ke ĉiuj kiuj rajtas aliri tiun lokon, tie kondutu same kiel mi fidas, ke vi kondutos. Dio, kiu certe benas ĉi vian persistan am-senton, vian fidelecon en la strebo serĉi la virinon, kiun Li mem al vi donis; Dio, kiu estas pli rigora ol homoj, sed samtempe pli indulgema, certe ne konsideros tian neregulecon en via serĉado. Vi nur memoru, ke pri via konduto en tiu loko, ni ambaŭ devos doni praviĝon: al homoj, preskaŭ certe ne, sed al Dio sendube. Venu ĉi tien». Tion dirante, li leviĝis, kaj samtempe ankaŭ Renzo; kiu, plu aŭskultante liajn vortojn, decidis en si mem, male ol li intencis, prisilenti tiun tian promeson de Lucia. – Se li aŭdas ankaŭ tion ĉi, – li pensis, – li certe faros al mi aliajn malhelpojn. Aŭ mi ŝin trovos; kaj tiu-kaze, ni havos tempon por pri-diskuti tiun aferon; aŭ... kaj tiam! kia utilo? –

Tirinte lin al la kaban-pordo, kiu situis norde, la frato reparolis: «Aŭskultu; nia patro Felice, kiu ĉi tie estas la respondeculo de la pestulejo, hodiaŭ kondukos aliloken por kvaranteno la nemultajn resaniĝintojn. Vi vidas tiun preĝejon tie meze...» kaj, levante la senkarnan kaj tremetantan manon, li indikis maldekstre en la malserena aero la kapel-kupolon, kiu imponis super la mizeraj tendoj; kaj li daŭrigis: «Ĉirkaŭ tiun lokon ili nun kunvenas, por eliri procesie tra la pordo, tra kiu verŝajne vi eniris».

«Ha! Nun mi komprenas, kial oni tiel laboris, por malobstrukci la vojon».

«Ĝuste tial: kaj tre verŝajne vi aŭdis kelke da batoj de tiu sonorilo».

«Jes, mi aŭdis unu da ili».

«Temis pri la dua: ĉe la tria, ĉiuj estos kunvenintaj: patro Felice faros al ili mallongan parolon; kaj poste li ekmarŝos kune kun ili. Vi, ĉe tiu sonoro, iru tien; klopodu starigi vin malantaŭ ili, ĉe unu flanko de la vojo, kie, ne ĝenante, nek atentigante, vi povos vidi ilin pasi; kaj vidu... vidu, ĉu eventuale ŝi ĉeestas. Se Dio ne volis ŝian ĉeeston, tiu flanko», kaj li levis denove la manon, montrante la flankon de la konstruaĵo, kiu staris fronte: «tiu parto de la konstruaĵo, kaj parto de la antaŭa spaco, estas destinita al virinoj. Vi vidis tabul-barilon kiu dividas tiun kvartalon dis de tiu ĉi, sed en iuj lokoj ĝi estas interrompita, aliloke ĝi estas malfermita, tiel ke al vi ne estos malfacile eniri. Kaj post via eniro, se vi faros nenion suspektindan, tre verŝajne oni nenion diros al vi. Se tamen oni al vi metus malhelpon, diru ke patro Cristoforo el *** konas vin, kaj respondecos pri vi. Vi tie serĉu ŝin; serĉu ŝin kun fidemo kaj... kun rezignacio. Ĉar, memoru, ke ne bagatelaĵon vi venis serĉi tie ĉi: vivanton en pestulejo! Ĉu vi scias kiomfoje mi vidis renoviĝi ĉi-mian povran popolon! Kiom multe da ili mi vidis forportataj, kiom malmulte mi vidis eliri!... Iru dispona al ofero...».

«Jes ja; ankaŭ mi mem komprenas», interrompis Renzo strabigante la okulojn, kaj tute ŝanĝante mienon; «mi komprenas! Mi iras: mi rigardos, mi serĉos, tie, ĉi tie, kaj plue, tra la tuta pestulejo, ĉiudirekte... kaj se mi ne ŝin trovos...».

«Kio, se vi ne ŝin trovos?» diris la frato, kun serioza kaj atendema mieno, kaj admona rigardo.

Sed Renzo, kies rabio, reekscitite de la imago pri tiu dubo, blindigis la racion, ripetis kaj daŭrigis: «se mi ne ŝin trovos, mi klopodos trovi iun alian. Aŭ en Milano, aŭ en lia fia

palaco, aŭ ĉe la mondo-limo, aŭ hejme de la diablo, mi ja trovos tiun kanajlon, kiu disigis nin; tiun kanajlon, sen kiu Lucia estus mia dum jam dudek monatoj; kaj se estis destino, ke ni mortu, almenaŭ kune ni mortus. Se li ankoraŭ vivas, mi trovos lin...». «Renzo!» diris la frato, kaptante lin je unu brako, kaj rigardante lin eĉ pli severe.

«Kaj se mi trovos lin», daŭrigis Renzo, tute blinda pro kolero, «se la pesto ne jam faris justecon... ne plu estas la tempo, en kiu fiulo, kun siaj bravuloj ĉirkaŭe, povas konduki homojn al malespero kaj tion primoki: venis tempo, kiam homoj sin alfrontu vizaĝ' al vizaĝe: justecon faros mi mem!».

«Malfeliĉega!» kriis patro Cristoforo per voĉo reakirinta la tutan iaman forton kaj sonoron: «malfeliĉega!» kaj lia kapo, ĝis tiam falanta al la brusto, releviĝis; la vangoj koloriĝis per iama viveco; kaj lia okul-fajro havis ion teruran. «Rigardu, malfeliĉa!». Kaj per unu mano premante kaj forte skuante la brakon de Renzo, la alian manon li movis antaŭ si, indikante kiel eble plej vaste la ĉirkaŭan doloran scenon. «Rigardu, kiu do estas Tiu kiu punas! Kiu juĝas, ne juĝate! Kiu plagas kaj pardonas! Sed vi, tera vermo, vi volas fari justecon! For, malfeliĉega, foriru! Mi esperis... jes, mi esperis ke, antaŭ mia morto, Dio al mi donos tiun ĉi konsolon: aŭdi ke mia povra Lucia vivas; eble eĉ vidi ŝin, kaj aŭdi ŝin promesi, ke ŝi direktos anim-ripozan preĝon al tiu fosaĵo, kie mi estos subterigita. For, vi forigis mian esperon. Dio ne ŝin lasis surtere por vi; kaj vi, certe, ne aŭdacas taksi vin inda, ke Dio zorgu konsoli vin. Li certe zorgis por ŝi, ĉar ŝi estas unu el tiuj animoj, al kiuj estas rezervitaj la eternaj konsoloj. For! mi ne plu havas tempon por aŭskulti vin».

Kaj tion dirante, li forpuŝis la brakon de Renzo, kaj ekiris

al kabano de malsanuloj.

«Ha Patro!» diris Renzo, sekvante lin kun preĝpeta sinteno: «ĉu vi volas forsendi min ĉi-maniere?». «Kiel!» reparolis la kapuceno, ne malpli severe. «Ĉu vi aŭdacas postuli, ke mi rabu tempon je tiuj ĉi afliktitoj, atendantaj ke mi parolu al ili pri la Dia pardono, por aŭskulti viajn rabiajn voĉojn, viajn venĝajn intencojn? Mi aŭskultis vin, kiam vi petis konsolon kaj helpon; mi lasis karitaton por alia karitato; sed nun vi havas en-kore vian venĝon: kion vi volas de mi? Iru for. Ĉi tie mi vidis plurajn ofenditojn morti pardonante; kaj ofendintojn ĝemi, ke ili ne havas eblecon humiliĝi antaŭ ofendito: mi ploris kun unuj kaj aliaj; sed kun vi, kion mi faru?». «Ha, mi pardonas lin! mi vere pardonas lin, mi lin pardonas por ĉiam!» elkriis la junulo.

«Renzo!» diris la frato, kun pli trankvila seriozo: «pripensu; kaj diru do al mi, kiomfoje vi jam pardonis lin».

Kaj, restinte iomtempe sen ricevi respondon, li subite mallevis la kapon, kaj, kun obtuza kaj malrapida voĉo, li daŭrigis: «vi ja scias, kial mi surportas tiun ĉi robon».

Renzo hezitis.

«Vi ja scias!» reparolis la maljunulo.

«Mi scias», respondis Renzo.

«Ankaŭ mi mem malamis: mi, kiu riproĉis vin pro unu penso, pro unu vorto, mi la viron, kiun mi malamis elkore, kiun delonge mi malamis, mi mortigis».

«Jes, sed temis pri perfortulo, unu el tiuj...». «Silentu!» interrompis la frato: «ĉu vi kredas ke, se ekzistus unu pravigo, mi ne estus trovinta ĝin en tridek jaroj? Ha! se mi nun povus en vian koron enmeti la senton, kiun poste mi daŭre havis, kaj ankoraŭ havas por la viro, kiun mi malamis! Se mi povus! ĉu

mi? sed Dio ja povas: Li efektivigu!... Aŭdu, Renzo: Li amas vin pli multe ol kiom vi mem amas vin: vi ja povis maĥinacii venĝon; sed Li havas sufiĉe da forto kaj mizerikordo, por al vi malebligi ties efektivigon; Li faras al vi gracon, je kiu alia homo² estis tro malinda. Vi ja scias, vi multfoje diris, ke Li povas haltigi la manon de perfortulo; sed sciuj, ke Li povas haltigi ankaŭ tiun de venĝemulo. Kaj, ĉu vi kredas ke, ĉar vi estas malriĉa, ĉar vi estas ofendita, Li ne povas defendi kontraŭ vi homon, kiun Li kreis laŭ sia bildo? Ĉu vi kredas, ke Li lasas vin fari ĉion ajn, kion vi volas? Ne! sed ĉu vi scias, kion vi povas fari? Vi povas malami kaj damniĝi; vi povas, per via sento, forigi de vi ĉian benon. Ĉar, kia ajn estus la rezulto de la faroj, kian ajn bonŝancon vi havus, vi certu, ke ĉio estos puno, ĝis vi pardonos tiamaniere, ke vi ne plu povos diri denove: mi pardonas lin».

«Jes, jes», diris Renzo, tute kortuŝita, kaj tute konfuza: «mi nun komprenas ke mi neniam pardonis lin vere; mi komprenas, ke mi parolis ne kiel kristano, sed kiel bestaĉo: kaj nun, per la graco de l' Sinjoro, jes, mi pardonas lin elkore».

«Kaj se vi lin vidus?». «Mi preĝus la Sinjoron, doni paciencon al mi, kaj tuŝi koron lian».

«Ĉu vi memorus, ke la Sinjoro ne diris ke ni pardonu niajn malamikojn; Li al ni diris, ke ni amu ilin? Ĉu vi memorus, ke Li amis tiun homon tiagrade, ke Li mortis por li?». «Jes, per Lia helpo».

«Venu do kun mi. Vi diris: tiun viron mi trovos; kaj vi lin trovos. Venu, kaj vi vidus, kiun do vi povas plu malami, al kiu do vi povas deziri kaj fari malbonon, kian vivon vi volus superregi».

² *alia homo*: patro Cristoforo mem.

Kaj, kaptinte la manon de Renzo, kaj preminte ĝin tiom forte, kiom povus fari sana junulo, li ekiris. Tiu, ne aŭdacante alion demandi, sekvis lin.

Post nemulte da paŝoj, la frato ekhaltis ĉe aperturo de kabano, fiksrigardis la vizaĝon de Renzo, kun graveco kaj tenereco; kaj enkondukis lin.

La unua afero, kiu vidiĝis ĉe l' eniro, estis malsanulo sidanta funde, sur pajlo; sed temis pri homo ne grave malsana, kiu eĉ ŝajnis proksima al konvalesko; kiu, vidinte la patron, balancis la kapon, kvazaŭ por esprimi neadon: la patro mallevis la sian, kun gesto de malĝojo kaj rezignacio. Intertempe Renzo, turnante kun malkvieta scivolo la rigardon al la aliaj objektoj, vidis tri aŭ kvar malsanulojn, distingis unu kuŝantan aparte sur matraco, envolvitan en littuko, kun surmetita senjora mantelo, kvazaŭ lit-kovrilo: li fiksrigardis lin, li rekonis Don Rodrigon, kaj li faris unu retropaŝon; sed la frato, denove sentigante la manon per kiu li preme tenis lin, trenis lin al la piedoj de la kuŝejo, etendis super ĝi la alian manon, kaj montris per la fingro la tie kuŝantan viron.

La malfeliĉulo kuŝis senmova; la okuloj, tute malfermitaj sed senrigarde; la vizaĝo, pala kaj kun disaj nigraj makuloj; la lipoj, nigraj kaj ŝvelaj: vi dirus ĝin vizaĝo de kadavro, se perforta kuntiriĝo ne atestus pri obstina pluvivo. La brusto leviĝis de temp' al tempo, per an hela spiro; la dekstra mano, ekster la mantelo, premis la bruston ĉe la koro, per hokaj fingroj, tute lividaj kaj pinte nigraj.

«Vi ja vidas!» diris la frato, kun mallaŭta kaj gravtona voĉo. «Povas esti puno, povas esti mizerikordo. La senton, kiun vi havos nun rilate tiun ĉi viron, kiu ja ofendis vin; la saman senton en la mondfina tago havos por vi Dio, kiun

ankaŭ vi mem ofendis. Benu lin, kaj vi estas benota. Jam kvar tagojn li kuŝas ĉi tie, kia vi lin vidas, sen signo de konsciiĝo. Eble la Sinjoro pretas donaci al li pent-momenton; sed Li volis ke vi mem preĝu por li: eble Li volas ke vi preĝu kune kun tiu senkulpulino; eble Li rezervas la gracon nur al via preĝado, al la preĝo de afliktita kaj rezignacia koro. Eble la anim-savo de tiu ĉi viro, kaj la via, nun dependas de vi, de via pardono, via kompatato... via amo!». Li eksilentis; kaj kunmetinte la manojn, super ilin li klinis la vizaĝon, kaj li ekpreĝis; Renzo faris la samon.

Ili estis jam kelke da momentoj en tiu sinteno, kiam eksonoris la sonorilo. Ambaŭ ekiris, kvazaŭ interkonsente; kaj ili eliris. Nek unu faris demandojn, nek la alia deklaregojn: iliaj vizaĝoj elokventis.

«Iru nun», reparolis la frato, «iru preta kaj ricevi gracon kaj fari oferon; preta laŭdi Dion, kia ajn estos la rezultato de viaj esploroj. Kaj kia ajn ĝi estos, venu sciigi min; ni laŭdos Lin kune».

Ĉe tio, nenion alian dirante, ili disiĝis; unu revenis tien, de kie li estis veninta; la alia ekiris al la kapelo, kiu distancis ne pli ol cent paŝojn.

XXXVI

Kiu do, antaŭ kelke da horoj, povus al Renzo prognozi ke, kulmine de tia serĉado, komence de ties plej dubaj kaj decidaj momentoj, lian koron dividos Lucia kaj Don Rodrigo? Kaj tamen okazis ĝuste tio: la bildo de Don Rodrigo miksiĝis kun ĉiuj karaj aŭ teruraj imagoj, kiujn espero aŭ timo laŭvice al li prezentis dumvoje; inter la jesojn kaj neojn, interbatalajn en lia menso, enŝoviĝis la vortoj aŭditaj apud tiu kuŝejo; kaj li ne povis fini preĝon por feliĉa sukceso de l' gravega provo, ne aldonante la preĝon tie komencitan, kaj abrupte interrompitan per la sonorilo.

La okangula kapelo, kiu, alta kelkŝtupe, staras meze de l' pestulejo, estis, en sia praa strukturo, ĉiuflanke malfermita, sen aliaj subtenoj krom pilastroj kaj kolonoj: konstruaĵo, se tiel diri, aĵura¹; ĉiu-fasade staris unu interkolona arkaĵo; interne, portiko ĉirkaŭis tion, kion oni propra-sence nomus preĝejo, kiu konsistis nur el ok arkaĵoj, respondaj al tiuj de la ok fasadoj, kaj ilin kovris kupolo; tiel ke la altaro, situanta centre, videblis el ĉiuj fenestroj de la ĉambroj interne de l' ĉirkaŭbaraĵo, kaj el preskaŭ ĉiuj punktoj de l' kampo. Nuntempe, ĉar la konstruaĵo estas destinita al tute alia celo, la vakaĵoj de la fasadoj estas masonitaj; sed la praa strukturo, netuŝite, klare montras ties iamajn staton kaj celon.

Renzo tuj post sia ekiro vidis patron Felice aperi en la kapela portiko, kaj sin prezenti sub la meza arkaĵo de l' flanko turnita al la urbo: la homgrupo jam kunvenis antaŭ tiun flankon, sur la esplanado en la vojo kiu kuŝis meze; el liaj gestoj, Renzo tuj divenis, ke li jam komencis la predikon.

Renzo iris tra tiuj vojetoj, por atingi la voston de l'

¹ *aĵura*: travidebla, ĉar senmura.

aŭskultantaro, kiel al li estis sugestite. Alveninte, li ekhaltis tute kviete, kaj per la rigardo esploris la tutan grupon; sed el tie li vidis nur densaĵon, kvazaŭ pavimon el hom-kapoj. Meze staris aro da kapoj kovritaj per kaptukoj kaj vualoj²: tien li fiksis pli atente la okulojn; sed, ĉar nenion plian li sukcesis tie malkovri, ankaŭ li mem levis la rigardon tien, kien ĉiuj fiksis la siajn. Lin kortuŝis kaj emociis la respektinda figuro de la predikanto; kaj, kun la atento, kiu al li restis en tiu atenda momento, li aŭdis jenan parton de lia dirado:

«Ni turnu penson al la miloj kaj miloj, elirintaj tra tie»; kaj, per fingro levita super la ŝultro, li indikis malantaŭ si la pordon kondukantan al la tombejo nome de sankta Gregoro, kiu tiutempe konsistis, oni povus diri, el unu granda fosaĵo: «ni ĉirkaŭrigardu la milojn kaj milojn, kiuj restas ĉi tie, tute malcertaj, tra kie do ili eliros; ni turnu la rigardon al ni mem, tiel malmultaj, kiuj eliras savite. Benata estu la Sinjoro! Benata en la justeco, benata en la mizerikordo! benata en la morto, benata en la bonfarto! benata en tio, ke Li elektis nin! Ho! Kiu-cele do Li tion volis, filetoj, krom por al si rezervi etan popolon, korektitan per aflikto, fervoran pro dankemo? Krom por ke, pli vive sentante nun, ke la vivo estas Lia donaco, ni estimu ĝin kiel meritas afero de li donacita, kaj ni travivu ĝin en agoj al Li oferindaj? Kiu-cele, krom por ke la memoro pri niaj suferoj igu nin pli kompatemaj kaj helpemaj al niaj proksimuloj? Homoj, kun kiuj ni suferis, esperis, timis; inter kiuj ni lasas amikojn, parencojn; kiuj entute estas niaj gefratoj; tiuj inter ili, kiuj vidis nin pasi meze de ili, eble ricevante iom da konsolo ĉe l' penso ke iel ajn kelkiu eliras

² *tukoj kaj vualoj*: temas pri virinoj: ili tiam kutimis kovri la kapon dumpreĝe.

savite, ricevu edifon el nia sinteno. Ne permesu Dio, ke ili vidu en ni bruan ĝojon, monduman ĝojon, pro tio ke ni evitis tiun morton, kun kiu ili ankoraŭ baraktas. Ili vidu, ke ni foriras, dankante por ni, preĝante por ili; tiel ke ili povu diri: eĉ foririnte, ili memoros pri ni, ili daŭrigos preĝi por ni, la mizeruloj. Ni komencu ek de ĉi tiu vojaĝo, ek de ĉi unuaj farotaj paŝoj tute karitatan vivon. La reakirintaj la iaman fortikecon, etendu fratecan brakon al senfortuloj; vi, junuloj, subtenu la maljunulojn; vi, restintaj senfilaj, vidu ĉirkaŭ vi kiom da filoj restis senpatraj! Vi mem al ili patru! Kaj tiu ĉi karitato, kovrante viajn pekojn, ankaŭ mildigos viajn dolorojn».

Ĉe tio, la obtuza murmuro el ĝemoj, la singultado pli kaj pli laŭta en la asembleo, subite interrompiĝis, kiam oni vidis la predikanton al si meti ŝnuron ĉirkaŭ la kolon,³ kaj genuiĝi: kaj oni restis tute silentaj, atendente, kion do li diros.

«Por mi», li diris, «kaj por ĉiuj miaj kunfratoj, kiuj tute senmerite estis elektitaj al la nobla privilegio servi Kriston en vi, mi humile pardon-petas, se ne inde ni plenumis tiom grandan servon. Se mallaboremo, se ribelo de la karno igis nin malpli atentaj al viaj necesoj, malpli pretaj al viaj voko; se malprava malpacienco, se kulpa tredo, foje prezentis nin antaŭ vi kun enua, aŭ severa mieno; se foje la malnobla penso, ke vi bezonas nin, igis nin trakti vin sen konvena humileco, se nia morala kadukeco kondukis nin al misfaro, kiu skandalis vin; pardonu nin! Tiele Dio pardonu ĉiun ŝuldon vian, kaj benu vin». Kaj, farinte super la aŭskultantaro grandan kruco-signon, li leviĝis.

Ni povis raporti, se ne la precizajn vortojn, almenaŭ la

³ ŝnuron ĉirkaŭ la kolo: pentofara gesto.

sencon, la temon, de tiuj, kiujn li fakte eldiris; sed ne eblas priskribi la manieron, kun kiu ili estis diritaj. Estis maniero de l' homo, kiu nomis privilegio la servon al pestuloj, ĉar li vere taksis ĝin tia; kiu konfesis, ke li ne inde plenumis ĝin, ĉar li sentis ke ne inde li plenumis; kiu petis pardonon, ĉar li estis konvinkita ke li ĝin bezonas. Sed la homoj vidintaj ĉirkaŭ si tiujn kapucenojn nenion zorgantaj krom ilin servi, kaj vidintaj multajn el ili morti, kaj la nun parolantan ilianome ĉiam unuaranga en penado kiel en aŭtoritato, ĝis vivo-danĝero; vi imagu kun kiaj singultoj, kun kiaj larmoj ili respondis al tiaj vortoj. Poste la mirinda frato prenis grandan krucon, kiu estis apogita al pilastro, levis ĝin antaŭ si, li lasis rande de la ekstera portiko la sandalojn, desupris tra l' ŝtupoj, kaj meze de la hom-amaso, kiu respektete havigis al li spacon, li ekiris, por sin starigi fronte.

Renzo, larmo-plena, ne malpli ol se li estus unu el la adresatoj de tia nekutima pardonpeto, ankaŭ li mem retiriĝis, kaj starigis sin flanke de kabano; kaj tie li restis atende, duonkaŝite, kun la kapo antaŭen kaj la korpo malen, kun tute malfermitaj okuloj, kun ege batanta koro, sed samtempe kun nova kaj speciala fido, mi kredas pro la tenereco, kiun al li inspiris la prediko, kaj la spektaklo de l' ĝenerala tenereco.

Kaj jen alvenas patro Felice, nuda-piede, kun tiu ŝnuro ĉirkaŭ-kole, kun tiu longa kaj peza kruco levita; pala kaj senkarna la vizaĝo, kiu elspiris samtempe penton kaj kuraĝon; kun malrapida sed rezoluta paŝo, kvazaŭ de l' homo, kiu nur zorgas indulgi alies senfortecon; kaj entute kvazaŭ homo, al kiu tiuj aldonaj klopodoj kaj penoj donus forton por elteni la multajn kaj necesajn ligitajn kun lia tasko. Tuj malantaŭ venis la iom pli aĝaj infanoj, grand-parte sen-ŝuaj, tre malmultaj tute

vestitaj, iuj eĉ nur ĉemizitaj. Sekvis la virinoj, preskaŭ ĉiuj mankondukante po unu knabinon, alterne kantante la *Miserere*-psalmon; kaj la senforta sono de tiuj voĉoj, la paleco kaj langvoro de tiuj vizaĝoj taŭgus por plenigi per kompato la animon de ajna homo, kiu tie troviĝus kiel simpla spektanto. Sed Renzo rigardis, esploris, de vico al vico, de vizaĝo al vizaĝo, neniun neglektante; ĉar la procesio iris tiel malrapide, ke li tute facile povis tion fari. Oni pasas kaj pasas; li rigardas kaj rigardas; ĉiam vane: li turnis rapidan rigardon al la ankoraŭ post-restantaj vicoj: jam da ili malmultas; jen la lasta; ĉiuj forpasis; ĉiuj vizaĝoj tute nekonataj. Kun pendaj brakoj, kun flanken-klinita kapo, li akompanis per la okulo tiun virinaron, dum antaŭ li pasis la viroj. Nova atento, nova espero en li estiĝis, ĉe l' apero, post ĉi-lastaj, de kelke da ĉaroj, sur kiuj sidis la konvaleskantoj ankoraŭ ne povantaj marŝi. Tie la virinoj veturis kiel lastaj; kaj la ĉararo veturis tiel malrapide, ke Renzo same povis esplori ĉiujn, kaj eĉ ne unu eskapis de lia observo. Sed kio? Li esploras la unuan ĉaron, la duan, la trian kaj tiel plu, ĉiufoje kun la sama rezulto, ĝis la lasta, post kiu neniu plu venis krom alia kapuceno, serioza kaj kun bastono enmane, kvazaŭ reganto de la tuta societo. Temis pri tiu patro Michele, kiun ni jam diris havigita al patro Felice kiel kunreganto.

Tiele tute svenis tiu kara espero; kaj, per sia malapero, ĝi ne nur forigis la alportitan konsolon, sed, kiel plejofte okazas, lasis la viron pli stataĉa ol antaŭe. Nun maksimume li povis esperi, ke li trovos Lucia-n malsana. Tamen, ĉe l' pliiĝinta timeo, kiu anstataŭis tiun ardan esperon, la kompatindulo alkroĉiĝis per ĉiaj fortoj de sia spirito al tiu ĉi malĝoja, febla fadeno; li eniris la vojeton, kaj ekiris en la direkton, de kie

estis veninta la procesio. Kiam li alvenis bazen de la kapelo, li iris genuiĝi sur la lasta ŝtupo; kaj tie li turnis al Dio preĝon, aŭ pli bone konfuzajon el senordaj vortoj, el stumpaj frazoj, el interjekcioj, el petegoj, el plendoj, el promesoj: unu el tiuj paroloj, kiujn oni ne adresas al homoj, ĉar ĉi-lastaj ne havas sufiĉe da penetremo, por ilin kompreni, nek da pacienco, por ilin aŭskulti; kaj homoj estas ne sufiĉe grandanimaj, por ilin kompati sen malŝato.

Li leviĝis iom konsolita; li ĉirkaŭiris la kapelon; li troviĝis en la alia vojeto, kiun li ne jam vidis, kaj kiu kondukis al la alia pordego; post kelke da paŝoj, li ekvidis la tabulan baraĵon, kiun al li menciis la frato, sed interrompitan ie kaj tie, ĝuste kiel al li diris patro Cristoforo; li eniris tra unu el tiuj aperturoj, kaj tiel li troviĝis en la virina kvartalo. Preskaŭ ĉe l' unua paŝo, li vidis surgrunde tintilon, el tiuj, kiujn monatioj portis ligitaj al unu piedo; li ekpensis ke tia ilo povus al li roli kiel pasporto en tiu loko; li prenis ĝin, li ĉirkaŭrigardis, ĉu oni lin vidas, kaj li al si ligis ĝin laŭ monatia kutimo. Kaj li tuj komencis tiun esploron, kiu, nur pro la kvanto de l' esplorataj objektoj, estus terure peniga, eĉ se ili estus tute ali-specaj; li komencis revui, aŭ pli ĝuste kontempli novajn mizerojn, parte tiel similajn al la jam viditaj, parte tiel malsamajn: ĉar, sub sama malfeliĉego, estis ĉi tie ali-speca suferado, se tiel diri, alia langvoro, alia plendado, alia elteno, alia reciproka kompatado kaj helpo; estis, por eventuala rigardanto, alia kompatsento kaj alia abomeno.

Li jam trairis mi ne scias kiom da vojo, senfrukte kaj senakcidente, kiam li ekaŭdis malantaŭ si «ho!»-vokon, kiu ŝajnis celita al li. Li sin turnis kaj vidis, iom distance, komisaron levi la manon direkte ĝuste al li, kriante: «tien en la

ĉambrojn, ĉar bezonatas helpo: ĉi tie forportado ĵus finiĝis».

Renzo tuj komprenis, kio do li estas taksata, kaj ke la miskomprenon kaŭzis la tintilo, kaj li nomis sin bestaĉo, pro tio ke li pensis nur pri la implikoj, kiujn tiu signalo povos evitigi, kaj ne tiujn, kiujn ĝi povos venigi; sed tuj li ekpensis kiel liberiĝi el tiu viro. Li rapide kaj ripete faris al li kapgeston, kvazaŭ por esprimi, ke li komprenis kaj obeas; kaj li sin kaŝis for de lia vid-kampo, ŝovante sin flanken, inter la kabanaj.

Kiam al li ŝajnis, ke li estas sufiĉe for, li decidis liberiĝi el la kaŭzo de tiu impliko; kaj, por fari tion ne rigardate, li lokis sin en spaceton inter du kabanaj, kiuj staris, se tiel diri, dors' al dorse. Li sin klinas por malligi la tintilon, kaj dum li tiel sin tenas kun la kapo apogita al la pajlo-vando de unu el la kabanaj, el ĝi atingas lian orelon voĉo... Ho Ĉielo! ĉu eblas? Lia tuta animo estas en tiu orelo: la spirado estas interrompita... Jes! jes! estas ĝuste tiu voĉo!... «Pri kio timi?» diradis tiu dolĉa voĉo: «ni travivis provojn tute pli gravajn ol ŝtormon. Tiu kiu gardis nin ĝis nun, gardos nin ankaŭ en tiu ĉi momento».

Se Renzo ne eligis kriegon, tio ne estis pro timo malkaŝiĝi, sed ĉar al li ekmanis la spiro. Senfortiĝis liaj genuoj, nebuliĝis la vidpovo; sed nur en la unua momento; en la dua li jam staris, pli vigla, pli fortika ol antaŭe; per tri saltoj li ĉirkaŭiris la kabanon, atingis la aperturon, ekvidis la parolantaron, li vidis ŝin stara, klinita super liteto. Ŝi sin turnas ĉe l' bruo; ŝi rigardas, ŝi kredas ke ŝi misvidas, ke ŝi sonĝas; ŝi rigardas pli atente, kaj krias: «ho benata Dio!»

«Lucia! mi vin trovis! mi vin trovas! estas ĝuste vi! vi vivas!» elkriis Renzo plu venante, tute trema.

«Ho benata Dio!» ripetis Lucia, eĉ pli trema: «ĉu vi? kio estas tio? kiamaniere? kial? La pesto!». «Mi havis ĝin. Kaj kio pri vi?...». «Ha!... ankaŭ mi mem. Kaj pri mia patrino..?».

«Mi ne vidis ŝin, ĉar ŝi estas en Pasturo; sed mi kredas ke ŝi bonfartas. Sed vi... kiel ankoraŭ pala vi estas! kiel senforta vi aspektas! Resaniĝis tamen, ĉu vi resaniĝis?». «La Sinjoro volis lasi min ankoraŭ surtere. Ha Renzo! Kial vi estas ĉi tie?». «Kial?» diris Renzo pli kaj pli proksimiĝante: «ĉu vi demandas min kial? Kial mi devus veni? Ĉu vi bezonas, ke mi tion al vi diru? Kiun do mi havas, al kiu mi pensu? Ĉu mi ne plu nomiĝas Renzo? Ĉu vi mem ne plu estas Lucia?».

«Ha, kion vi diras! kion vi diras! Sed ĉu mia patrino ne skribigis al vi...?». «Jes: bedaŭrinde ŝi skribigis. Ja belaj aferoj, por skribigi al povrulo malfeliĉa, turmentita kaj vaganta, al junulo, kiu da spitaĵoj almenaŭ, tute neniam al vi faris!». «Sed, Renzo! Renzo! ĉar vi jam sciis... kial do veni? kial?».

«Kial veni? Ho Lucia! ĉu vi demandas, kial veni? Post tiom da promesoj! Ĉu ni ne plu estas ni mem? Ĉu vi ne plu memoras? Kio do al ni mankis?». «Ho Sinjoro!» elkriis plej malĝoje Lucia, kunmetante la manojn, kaj levante la okulojn al la ĉielo: «ho Sinjoro! kial vi ne faris al mi la gracon, venigi min al Vi⁴...? Ho Renzo! kion do vi faris? Jen; mi komencis esperi, ke... ĉe l' tempo-paso, mi forgesos...». «Ja bela espero! ja belaj aferoj, por diri ĝuste vizaĝ-al-vizaĝe!». «Ha kion vi faris! Kaj ĝuste en tiu ĉi loko! meze de tiuj ĉi mizeroj! de tiuj ĉi spektakloj! tie ĉi, kie oni nur mortadas, vi povis...!».

«Pri mortantoj, endas preĝi Dion por ili, kaj esperi, ke ili iros en feliĉan lokon; sed eĉ tio ne pravigas, ke vivantoj vivu

⁴ *venigi min al Vi*: t.e. kaŭzi mian morton.

malespere...». «Sed, Renzo! Renzo! certe vi ne pensas, kion vi diras. Promeso al la Madono!... Voto!».

«Kaj mi al vi diras, ke tiaj promesoj estas senvaloraj».

«Ho Sinjoro! Kion vi diras? Kie vi vivis dum tiu tuta tempo? Kiun vi frekventis? Kiel vi parolas?».

«Mi parolas kiel bona kristano; kaj pri la Madono, mi pensas pli ĝuste ol vi; ĉar mi kredas, ke ŝi ne volas promesojn damaĝaj al proksimulo. Se la Madono mem estus parolinta, ho jes! Sed kio estis? via elpenso. Ĉu vi scias, kion vi devas promesi al la Madono? Promesu al ŝi, ke la unuan filinon, kiun ni naskigos, ni nomos Maria liahonore: ĉi tion ankaŭ mi mem konsentas promesi: jen la aferoj, kiuj certe pli-multe honoras la Madonon: tiuj ĉi estas devotaĵoj⁵ pli senc-havaj, kiuj neniun damaĝas».

«Ne ne; ne diru tiaĵon: vi ne konscias, kion vi diras: vi ne konscias, kion signifas eldiri voton: vi ne travivis tian situacion: vi ne spertis. Foriru, foriru, pro amo al Ĉielo!». Kaj ŝi disiĝis impete de li, reirante al la liteto.

«Lucia!» diris Renzo senmove: «diru almenaŭ, diru al mi: se ne estus tiu kialo... ĉu vi restus la sama por mi?». «Homo sen-kora!» respondis Lucia, sin turnante, kaj apenaŭ retenante larmojn: «kiam vi igus min eldiri senutilajn vortojn, vortojn kiuj suferigus min, vortojn, kiuj eble estus pekaj, ĉu vi kontentus? Foriru, ho foriru! forgesu min: kompreneblas ke ni ne estis tiel destinitaj! Ni revidos nin en-ĉiele: entute oni ne devas resti longtempe en tiu ĉi mondo. Foriru, klopodu sciigi al mia patrino ke mi resaniĝis, ke ankaŭ tie ĉi Dio daŭre helpis min, ke mi trovis bonan animon, tiun ĉi bonkoran virinon, kiu rolas kun mi kvazaŭ patrino; diru al ŝi, ke mi esperas, ke ŝi

⁵ *devotaĵoj*: tuto de preĝoj kaj faroj el fervora religiemo.

estos savita el tiu ĉi malsano, kaj ke ni revidos nin, kiam Dio volos, kaj kiel li volos... Foriru, pro amo al Ĉielo, kaj ne pensu min... krom kiam vi preĝos la Di-Sinjoron».

Kaj, kvazaŭ nenion plu havante por diri, nek alion volante aŭdi, kvazaŭ eskapante de danĝero, ŝi retiriĝis eĉ pli proksime al la liteto, kie kuŝis la virino, pri kiu ŝi ĵus parolis.

«Aŭdu, Lucia, aŭdu!» diris Renzo, ne tamen proksimiĝante.

«Ne, ne; foriru, pro karitato!». «Aŭdu: patro Cristoforo...».

«Kio?».

«Estas ĉi tie».

«Ĉu tie ĉi? kie? Kiel vi tion scias?».

«Mi ĵus al li parolis; mi restis kun li longan momenton: kaj mi opinias, ke religiulo, kia li estas...».

«Li estas ĉi tie! por helpi la povrajn pestulojn, tutcerte. Sed kio pri li? Ĉu lin trafis la pesto?»

«Ha Lucia! mi timas, mi timas bedaŭrinde...» kaj dum Renzo tiel hezitis diri la vorton por li ĉagrenan, kaj kiu tia nepre estos ankaŭ por Lucia, ĉi-lasto denove disiĝis de la liteto, kaj reproksimiĝis al li: «mi timas, ke li estas trafita!».

«Ho kompatinda sankta viro! Sed kion mi diras kompatinda? Kompatindas ni. Kiel li statas? Ĉu li kuŝas enlite? Ĉu li estas flegata?».

«Li staras, rondiras, asistas aliulojn; sed, se vi lin vidus, kian koloron li havas, kiel li staraĉas! Oni vidis tiom multe da tiaj, ke bedaŭrinde... oni ne eraras!».

«Ho ve al ni! Kaj li estas ĝuste ĉi tie, ĉu?».

«Ĉi tie, sufiĉe proksime: iom pli distance ol de via hejmo ĝis la mia... se vi memoras...!».

«Ho sanktega Virgulino!».

«Bone, iom pli longe. Kaj imagu, ĉu ni parolis pri vi! Li diris al mi tiajn aferojn... Kaj se vi scius, kion li al mi montris! Vi aŭdos; sed unue mi volas diri al vi tion, kion li al mi diris, per sia propra buŝo. Li diris, ke estas bone ke mi venas serĉi vin, kaj ke la Sinjoro ŝatas, ke junulo tiele kondutas, kaj ke li helpos min trovi vin, kiel fakte okazis: sed li ja estas sanktulo. Konsekvence vi mem vidas!».

«Sed tiele li parolis, ĉar li ne scias...».

«Kiel li sciu pri l' aferoj, kiujn faris vi mem per via propra cerbo, sen-regule, kaj sen ies konsilo? Bonkora kaj prudenta homo, kia li estas, tute ne elpensas tiaĵojn. Sed kion li al mi montris!». Kaj ĉe tio li rakontis la viziton al tiu kabano: Lucia, malgraŭ tio ke ŝiaj sensoj kaj animo dum tiu restado nepre kutimiĝis al plej akraj impresoj, estis tute absorbita de hororo kaj kompatato.

«Kaj eĉ tie» daŭrigis Renzo, «li parolis kiel sanktulo: li diris ke eble la Sinjoro destinis doni pardonon al tiu mizerulo... (nunmomente mi tute ne povus lin nomi alimaniere)... ke Dio atendas oportunan momenton por venigi lin al Li; sed Li volas ke ni preĝu kune por li... Kune! ĉu vi komprenas?».

«Jes, jes; ni preĝos, ĉiu tie, kie la Sinjoro nin volos. Li mem potencas kunigi la preĝojn».

«Sed se mi raportas ĝuste liajn vortojn...!».

«Sed, Renzo: li ne scias...».

«Sed ĉu vi ne komprenas, ke kiam parolas sanktulo, Dio mem parolas per li? kaj ke li ne tiele parolus, se ne tiele devus esti...? Kaj kio pri la animo de tiu mizerulo? Mi ja preĝis, kaj preĝos por li: elkore mi preĝis, ĝuste kvazaŭ li estus mia frato.

Sed kiel vi imagas ke statos la mizerulo en la transa mondo, se ne ĝustiĝas tiu ĉi afero, se ne reboniĝas en ĉi-mondo la malbono, kiun li faraĉis? Kaj se vi komprenas la pravon, tiam ĉio estas denove kiel antaŭe, paseo estas paseo: li pentofaris en ĉi-mondo...».

«Ne, Renzo, ne. La Sinjoro ne volas ke ni malbonfaru, por ke Li mizerikordu. Ĉi-koncerne, lasu ke Li mem faru: rilate nin, nia devo estas preĝi. Se mi estus mortinta tiunokte, ĉu Dio ne povus lin pardoni? Kaj se mi ne mortis, se mi estas liberigita...».

«Kaj via patrino, tiu povra Agnese, kiu ĉiam tre amis min, kaj kiu konsumiĝis dezirante vidi nin geedzoj, ĉu ne ankaŭ ŝi mem al vi diris, ke temas pri malĝusta ideo? Ŝi, kiu ankaŭ alifoje komprenigis al vi la pravon, ĉar, rilate certajn aferojn, ŝi pensas pli ĝuste ol vi...».

«Mia patrino! ĉu vi imagas, ke mia patrino min konsilis malobservi voton! Sed, Renzo, vi ne plu prudentas».

«Ho! ĉu mi al vi diru? Jen: vi, la virinoj, ĉi tiajn aferojn scii ne povas. Patro Cristoforo al mi diris, ke mi revenu al li, por raporti, ĉu mi trovis vin. Mi iras: ni aŭdos lin: tio, kion li diros...».

«Jes, jes; iru al tiu sankta viro; diru al li, ke mi preĝas por li, ke li preĝu por mi, kiu tre, tre bezonas tion! Sed, pro ĉielo, pro via animo, pro mia animo, ne plu venu vi ĉi tien, por al mi malbonfari, por... min tenti. Patro Cristoforo mem scipovos al vi klarigi la aferojn, kaj reprudentigos vin; li vin helpos pacigi la koron».

«Pacigi la koron! Ho! tion vi forigu el via cerbo. Vi jam al mi skribigis tiun ĉi parolaĉon; kaj nur mi mem scias, kian suferon ĝi kaŭzis al mi; kaj nun vi aŭdacas eĉ diri ĝin al mi.

Kaj mi male al vi diras klare kaj malkaŝe, ke mi la koron neniam pacigos. Vi volas forgesi min; kaj mi ne volas forgesi vin. Kaj mi al vi promesas, vidu, ke se vi al mi perdigas la prudenton, mi ne plu reakiros ĝin. Damniĝu la metio, damniĝu la bonmora konduto! Vi volas kondamni min al dumviva rabio; kaj kiel rabiulo mi vivos... Kaj tiu malfeliĉulo! La Sinjoro scias, ĉu mi pardonis lin elkore; sed vi... Ĉu vi volas ke mi dumvive pensu, ke se li ne enmiksiĝus...? Lucia! vi al mi diris, ke mi forgesu vin: ke mi forgesu vin! Kiel mi tion faru? Al kiu, vi kredas, ke mi pensis, dum tiu tuta tempo?... Kaj post tiom da aferoj! post tiom da promesoj! Kian malbonon faris mi al vi post nia disiĝo? Ĉu vi traktas min ĉi tiel, ĉar mi suferis? ĉar mi havis malfeliĉojn? ĉar la homoj de la mondo persekutis min? ĉar mi pasigis tiom da tempo ekster mia hejmo, malfeliĉa, for de vi? ĉar, tuj kiam mi povis, mi venis serĉi vin?».

Lucia, kiam la ploro al ŝi ebligis formi vortojn, elkriis, kunigante denove la manojn, kaj levante ĉielen la okulojn plenegajn de larmoj: «ho sanktega Virgulino, vi helpu min! Vi ja scias ke, post tiu nokto, mi neniam pasigis momenton kiel la nunan. Vi helpis min tiam; helpu min ankaŭ nun!».

«Jes, Lucia; estas bone, ke vi preĝpetas la Madonon; sed kial vi volas kredi ke Ŝi, kiu estas tiel bonkora, la patrino de mizerikordo, povas plezuriĝi suferigante nin... aŭ almenaŭ min... pro vorto elbuŝigita en momento kiam vi ne konsciis vian diron? Ĉu vi volas kredi, ke Ŝi helpis vin tiam, por lasi nin implikitaj pli poste?... Se male tio estus preteksto; se la vera kaŭzo estus tio, ke mi fariĝis al vi abomena... vi diru ĝin... malkaŝe parolu».

«Pro karitato, Renzo, pro karitato, pro viaj povraj

mortintoj, vi ĉesu, vi ĉesu; ne mortigu min... Ĝi ne estus konvena momento. Iru al patro Cristoforo, rekomendu min al li, ne plu revenu tien ĉi, ne plu revenu tien ĉi».

«Mi iras; sed pensu, ĉu mi ne intencas reveni! Mi revenus, eĉ ĝis la mondo-limo mi revenus». Kaj li malaperis.

Lucia iris sidiĝi, aŭ pli ĝuste sin faligis grunden apud la liteto; kaj, al ĝi apoginte la kapon, ŝi daŭrigis ploregi. La virino, kiu ĝis tiam restis senparola, kun malfemitaj okuloj kaj oreloj, demandis, kio estas tiu apero, tiu disputo, tiu ĉi ploro. Sed eble la leganto siaflanke demandas, kiu estis tiu virino; kaj por lin kontentigi, sufiĉos ankaŭ ĉi tie ne multe da vortoj.

Temis pri iom riĉa komercistino, eble tridek-jara. En malmulte da tagoj, en sia hejmo ŝi vidis morti la edzon kaj ĉiujn gefilojn: post ne-multe, trafite ankaŭ ŝi de pesto, ŝi estis veturigita al la pestulejo kaj kuŝigita en tiu kabaneto, kiam Lucia, superinte senkonscie la furiozon de l' morbo, kaj same senkonscie ŝanĝinte plurfoje najbarinojn, komencis resaniĝi kaj rekonsciiĝi; ĉar ek de la komenco de l' malsano, kiam ŝi loĝis ankoraŭ hejme de Don Ferrante, ŝi restis kvazaŭ sensenca. La kabano povis gastigi nur du personojn; kaj inter tiuj ĉi du virinoj, afliktitaj, forlasitaj, konsternitaj, solaj en tiu granda homamaso, estiĝis baldaŭ intimeco, amsento, kia povus naskiĝi apenaŭ el longa kunvivo. Post mallonge Lucia kapablis helpi la alian, ege malsanan. Nun, kiam ankaŭ ĉi-lasta estis ekster danĝero, ili reciproke sin kompaniis kaj kuraĝigis kaj gardis; ili al si promesis reciproke, ke ili forlasos kune la pestulejon; kaj faris aliajn akordojn, por ne eĉ pli poste disiĝi. La komercistino, kiu konfidis por gardo al sia frato, sanitara komisaro, la tre provizitajn hejmon kaj magazanon kaj kason, sed baldaŭ troviĝos kiel sola kaj malfeliĉa mastrino de ege pli

multe ol kiom ŝi bezonus por vivi bonstate, intencis teni kun si Lucia-n, kvazaŭ filinon, aŭ fratinnon. Lucia tion akceptis, imagu kun kia dank-sento al ŝi kaj al la Providenco; sed nur ĝis ŝi povos ricevi novaĵojn pri sia patrino, kaj espereble ricevi ties konsenton. Cetere, ŝi, tiel sindetena, eĉ ne unu vorton estis dirinta pri la geedziĝo-promeso, nek pri la aliaj eksterordinaraj aventuroj. Sed nun, en tia tempestego de sentoj, ŝi bezonegis ilin elverŝi, almenaŭ kiom la alia deziregis ilin aŭskulti. Kaj, preminte ambaŭmane ŝian dekstran, ŝi tuj komencis kontentigi ties demandon, sen alia deteniĝo, krom tiu kiun kaŭzis la singultoj.

Dume Renzo trotis direkte al la kvartalo de l' bonkora frato. Iom pene, ne sen reiroj el etaj mis-vojoj, li fine sukcesis ĝin atingi. Li trovis la kabanon, tamen ne lin mem; sed rondirante kaj serĉante ĉirkaŭe, li vidis lin en barako, dum, klinite kvazaŭ vizaĝ-al-grunde, li konsolis mortanton. Li haltis tie, atendente silente. Post nemulte, li vidis lin fermi la okulojn de tiu povrulo, genuiĝi, iomete preĝi, kaj leviĝi. Tiam Renzo iris al li renkonte.

«Ho!» diris la frato, vidante lin veni; «kio do?».

«Ŝi ĉeestas: mi ŝin trovis!».

«Kiel ŝi statas?»

«Resaniĝinta, aŭ almenaŭ ellitiĝinta.»

«Estu danko al la Sinjoro!».

«Sed...» diris Renzo, kiam li estis tiel proksima, ke li povis al li paroli flustre: «ĉeestas alia impliko».

«Kio estas?»

«Mi volas diri ke... Vi ja scias kiel bonvirta estas tiu povra junulino; sed foje ŝi estas iom fiks-idea. Post tiom da promesoj, post ĉio, kion ankaŭ vi mem scias, nun ŝi diras, ke

ŝi ne povas min edzigi, ĉar, ŝi diras, kion mi scias? ke, en tiu terura nokto, varmiĝis ŝia kapo, kaj ŝi tieldire votis sin al la Madono. Aferoj sensencaj, ĉu ne? Aferoj taŭgaj por havantoj sciencon kaj fundamenton por ilin fari, sed por ni, ordinariaj homoj, ne tute sciantaj, kiel fari... aferoj nevalidaj, ĉu ne?».

«Diru al mi: ĉu ŝi estas tre for de ĉi tie?».

«Ho ne: nur kelkpaŝe preter la preĝejo».

«Atendu min ĉi tie momente», diris la frato: «kaj ni tien iros kune».

«Tio signifas, ke vi al ŝi komprenigos...».

«Nenion mi scias, fileto; necesas, ke mi aŭskultu ŝin mem».

«Mi komprenas», diris Renzo, kaj li restis kun la okuloj fiksrigardaj algrunde, kaj la brakoj krucitaj surbruste, remaĉante sian malcertecon ankoraŭ tute plenan. La frato iris denove serĉi tiun patron Vittore, li denove lin petis anstataŭi lin, li eniris sian kabanon, de ĝi eliris kun la korbo ĉe-brake, revenis al Renzo, kaj al li diris: «ni iru»; kaj antaŭiris direkte al tiu tia kabano, kien antaŭ nelonge li estis enirinta kun Renzo.⁶ Ĉi-foje li eniris sola, kaj post momento li reaperis, kaj diris: «nenio! Ni preĝu; ni preĝu». Poste li daŭrigis: «nun vi mem gvidu min» .

Kaj nenion alian dirante, ili ekiris.

La vetero jam pli kaj pli malheliĝis, kaj prognozigis certan kaj baldaŭan ŝtormegon. Oftaj fulmoj disrompis la densiĝintan malhelon, kaj lumigis momente la longegajn portikajn tegmentojn kaj arkaĵojn, la kapelan kupolon, la malaltajn kabanajn kamentojn; kaj la tondroj, eksplodinte kun

⁶ la kabano de Don Rodrigo, kies antaŭmorta penton patro Cristoforo esperis.

subita bruego, trakuris murmurante de unu ĝis la alia ĉiela regiono. Antaŭmarŝis la junulo, zorgante trafi la ĝustan vojon, kun granda malpacienco alveni; kaj tamen mal-akcelante la paŝadon, por ĝin adapti al la fortoj de l' kuniranto; kiu, laca pro l' penoj, premate de l' malsano, kaj sufokate de l' varmego, marŝis pene, levante de temp' al tempo ĉielen la kavan vizaĝon, kvazaŭ por serĉi pli liberan spiron.

Renzo, vidinte la kabanon, ekhaltis, sin turnis, kaj diris kun trema voĉo: «ŝi estas ĉi tie».

Ili eniris... «Jen ili!» krias la virino kuŝanta sur liteto. Lucia sin turnas, rapidege leviĝas, iras renkonten al la oldulo, kriante: «ho kiun do mi vidas! Ho Patro Cristoforo!».

«Nu, Lucia! el kiom da afliktoj vin liberigis la Sinjoro! Vi ja devas kontenti, ke vi ĉiam esperis je Li».

«Ho jes! Sed vi, patro, kio? Ho ve, kiel vi ŝanĝiĝis! Kiel vi fartas? diru: kiel vi fartas?».

«Kiel Dio volas, kaj kiel, per lia graco, ankaŭ mi mem volas», respondis la frato kun serena mieno. Kaj apartiginte ŝin en angulon, li aldonis: «aŭdu: mi povas resti ĉi tie nur kelkmomente. Ĉu vi estas dispona konfidenci kun mi, kiel alifoje?».

«Ho! ĉu vi ne estas ĉiam mia patro?».

«Filino, kio do estas tiu ĉi voto, kiun Renzo al mi diris?».

«Estas voto kiun mi faris al la Madono... ho! dum granda aflikto!... ke mi ne edziniĝos».

«Povrulino! Sed ĉu vi tiam pripensis, ke vi estas ligita per promeso?».

«Ĉar la afero koncernis la Sinjoron kaj la Madonon!... mi tion ne pripensis».

«Filino, la Sinjoro ŝatas la oferojn, la donacojn, kiam ni

deprenas el niaĵoj. Ĝuste la koron Li volas, la volon: sed vi ne rajtis al li oferi la volon de aliulo, al kiu vi jam devigis vin».

«Ĉu mi malbonfaris?»

«Tute ne, povrulino, ne zorgu pro tio: mi eĉ kredas, ke la sankta Virgulino ŝatis la intencon de via afliktita koro, kaj ĝin oferis al Dio por vi. Sed diru al mi; ĉu de neniu konsilon vi petis pri tiu ĉi afero?».

«Mi ne pensis ke ĝi estas malbonfaro, kiun mi pekkonfesu: kaj la ioma bono, kiun oni povas fari, kiel sciate oni ne devas ĝin rakonti».

«Ĉu neniun alian motivon vi havas, kiu vin detenus plenumi la promeson, kiun al Renzo vi faris?».

«Koncerne ĉi tion... laŭ mi... kian motivon? Mi tute ne povas diri...» respondis Lucia, kun hezito, kiu malkaŝis tute alion ol malcertan penson; kaj sur ŝia vizaĝo, ankoraŭ senkolora pro l' malsano, subite ekfloris plej viva ruĝiĝo.

«Ĉu vi kredas», reparolis la oldulo, mallevente la okulojn, «ke Dio rajtigis sian Eklezion konfirmi aŭ nuligi la ŝuldojn kaj devojn, kiujn homoj eventuale surprenis rilate Lin, laŭ ke tio rezultigas pli grandan bonon?».

«Jes ja, mi tion kredas».

«Nu sciu, ke ni, komisiite por anim-zorgo en tiu ĉi loko, ricevis, por ĉiuj, kiuj al ni sin turnas, plej ampleksajn rajtigojn de la Eklezio; kaj konsekvence mi rajtas, se vi tion petas, vin liberigi el ĉiu ajn devigo, kiun vi eventuale surprenis per tiu voto».

«Sed ĉu ne estas peke returniĝi kaj penti pri promeso farita al la Madono? Mi tiam ĝin faris tute elkore...» diris Lucia, kiun forte agitis unuflanke la sturmo de tiu neatendita espero, ja tiele oni devas ĝin nomi, kaj aliflanke la atako de

teruro fortikigita de ĉiuj pensoj, kiuj delonge konsistigis la ĉefklopodon de ŝia animo.

«Ĉu peke, filino?» diris la patro: «ĉu peke peti helpon de la Eklezio, kaj peti ke ties servisto apliku la aŭtoritaton, kiun li ricevis de ĝi, kiu siavice ĝin ricevis de Dio? Mi ja vidis kiamaniere vi ambaŭ estas kondukitaj al kuniĝo; kaj, certe, se iam ajn viro kaj virino al mi ŝajnis kunigitaj de Dio mem, temas ĝuste pri vi ambaŭ: nun mi ne vidas, kial Dio volus vin disigitaj. Kaj mi benas lin, ke li rajtigis min, tiel malindan, paroli lianome, kaj revalidigi vian promeson. Kaj se vi petas, ke mi deklaru vin liberigita el tiu ĉi voto, mi tute ne hezitos fari tion; mi eĉ deziras ke vi tion petu».

«Do...! do...! mi tion petas»; diris Lucia kun vizaĝo, kiun perturbis nur pudoro.

La frato vokis per gesto la junulon, kiu staris en la plej fora anguleto, rigardante (ĉar nenion alian li povis fari) tute fikse al la interparolo, kiu tiom koncernis lin; kaj kiam li apudestis, la frato diris pli laŭte, al Lucia: «per la aŭtoritato, kiun mi ricevis de la Eklezio, mi deklaras vin sendevigita el la voto de virgeco, nuligante tion kio eventuale estis farita senkonsidere, kaj liberigante vin el ĉia devigo, kiun vi eventuale surprenis».

Imagu la leganto kiel sonis tiaj vortoj ĉe l' oreloj de Renzo. Li vive dankis la eldirinton per la okuloj; kaj tuj sed vane li serĉis tiujn de Lucia.

«Vi revenu, sekure kaj pace, al la iamaj pensoj», plu diris al ŝi la kapuceno: «vi denove preĝpetu la Sinjoron por la gracoj, por kiuj vi preĝpetis Lin iam, por esti sankta edzino; kaj vi fidu ke li donacos da ili pli abunde, post tiom da malfeliĉoj. Kaj vi», li aldonis, sin turnante al Renzo,

«memoru, fileto, ke se la Eklezio redonas al vi ĉi tiun kunulinon, tion ĝi faras ne por havigi al vi portempan kaj monduman konsolon, kiu, eĉ se ĝi povus esti tuteca, kaj sen kunmikso de ĉagreno, nepre devus finiĝi per granda doloro, okaze de via reciproka forlaso; sed tion ĝi faras por vin ambaŭ survojigi al konsolo senfina. Amu vin reciproke kiel kunvojaĝantojn, kun la penso ke vi devos forlasi vin, kaj la espero ke vi retrovos vin por ĉiam. Danku al la Ĉielo, kiu kondukis vin al tiu ĉi stato ne tra malordaj kaj pereontaj ĝojoj, sed tra afliktoj kaj mizeroj, por vin disponigi al ĝojo profunda kaj trankvila. Se Dio al vi donacos filetojn, vi celu ilin eduki por Li, enmeti en ilin amon al Li kaj al ĉiuj homoj; kaj tiam vi bone gvidos ilin ankaŭ koncerne la ceteron. Lucia! Ĉu li» kaj li indikis Renzon, «al vi diris, kiun do li vidis ĉi tie?».

«Ho patro, jes, li diris!».

«Vi preĝos por li! Senlace. Kaj ankaŭ por mi vi preĝos!... Filetoj! mi volas ke vi havu memoraĵon pri l' povra frato». Kaj ĉe tio li eligis el la korbo skatolon el ligno ordinara, sed tornita⁷ kaj polurita kun kapuceneska zorgemo; kaj li daŭrigis: «ĉi tie enestas restaĵo el tiu pano... la unua, kiun mi almozpeticis; tiu pano, pri kiu vi aŭdis! Mi lasas ĝin al vi; vi gardu ĝin; montru ĝin al viaj filetoj. Ili venos en malican mondon kaj en malicaj tempoj, meze de orgojluloj kaj provokemuloj: vi diru al ili, ke ili pardonu ĉiam, ĉiam! ĉion, ĉion! kaj ke ankaŭ ili mem preĝu por la povra frato!».

Kaj li etendis la skatolon al Lucia, kiu prenis ĝin tute respekte, kiel oni farus pri relikvo. Poste, kun pli trankvila voĉo, li reparolis al ŝi: «Nun al mi diru: kiajn helpojn vi havas tie ĉi en Milano? Kie vi pensas ekloĝi, elirinte de ĉi tie? Kaj

⁷ *tornita*: belforme prilaborita.

kiu vin kondukos al via patrino, kiun Dio volu gardita sana? ».

«Tiu ĉi bonkora sinjorino dume al mi patrinas: ni eliros kune de ĉi tie, kaj poste ŝi mem zorgos pri ĉio».

«Dio benu vin», diris la frato, proksimiĝante al la liteto.

«Miaflanke mi dankas vin», diris la vidvino, pro la konsolo, kiun vi donis al ĉi du povraj kreitaĵoj; kvankam mi planis teni por ĉiam kun mi tiun ĉi karan Lucia-n. Sed mi ŝin tenos intertempe; mi mem ŝin akompanos al ties vilaĝo, mi ŝin liveros al ties patrino; kaj», ŝi aldonis mallaŭte, «mi volas al ŝi prepari la edzinan tolkompleton. Mi posedas eĉ tro da havaĵo; kaj mi nenion plu havas el tiuj kiuj devus ĝin ĝui kune kun mi!».

«Tiele», respondis la frato, vi povas fari valoran oferon al la Sinjoro⁸, kaj bonfaron al la proksimulo. Mi al vi ne rekomendas tiun ĉi junulinon: mi ja vidas, ke ŝi estas kvazaŭ via filino: oni devas nur laŭdi la Sinjoron, kiu montras sin patro eĉ ĉe plagoj, kaj, okazigante vian renkontiĝon, donis tiel klaran signon de amo al vi ambaŭ. Nu», li daŭrigis, sin turnante al Renzo, kaj prenante lin ĉe unu mano: «Ni ambaŭ nenion plu havas por fari ĉi tie: kaj eĉ tro longe ni tie ĉi restis. Ni iru».

«Ho patro!» diris Lucia: «ĉu mi revidos vin ankoraŭ? Mi estas resaniĝinta; mi, kiu tute ne bonfaras en tiu ĉi mondo; kaj vi...!».

«Jam delonge», respondis kun serioza kaj dolĉa tono la maljunulo, «mi preĝpetas la Sinjoron pri graco tute granda: fini miajn vivo-tagojn servante l' proksimulon. Se Li volas nun tiun gracon al mi doni, mi bezonas, ke la havantoj por mi karitaton, helpu min por Lin danki. Ek; donu al Renzo viajn

⁸ oferon al la Sinjoro: akceptante rezignacie la morton de la familianoj.

komisiojn por via patrino».

«Rakontu al ŝi tion, kion vi mem vidis», diris Lucia al la fianĉo: «ke mi trovis alian patrinon, ke mi venos kune kun ŝi kiel eble plej baldaŭ, kaj ke mi esperas, esperegas ke mi ŝin trovos sana».

«Se vi bezonas monerojn», diris Renzo, «mi havas ĉi tie ĉiujn, kiujn vi al mi sendis, kaj...».

«Ne, ne», interrompis la vidvino: «mi mem havas havas da ili, eĉ tro multe».

«Ni iru», ripetis la frato.

«Ĝis revido, Lucia...! kaj ankaŭ vi, bona sinjorino», diris Renzo, ne trovante vortojn, por esprimi tion kion li sentis.

«Espereble la Sinjoro havigos al ni la gracon, ke ni ĉiuj revidu nin ankoraŭ!» elkriis Lucia.

«Li estu ĉiam kun vi, kaj benu vin», diris al la du kunulinoj frato Cristoforo; kaj kun Renzo eliris el la kabano.

Estis preskaŭ vespero, kaj la vetero pli kaj pli proksimiĝis al pluvo. La kapuceno denove proponis al la junulo gastitiunokte en lia barako. «Resti en via kompanio, mi ne povos», li aldonis: «sed ĉiuokaze vin ŝirmos tegmento».

Sed Renzo sentis deziregon foriri; kaj li ne zorgis resti pli longe en tia loko, ne povante tion elprofiti por vidi Lucia-n, nek kunresti iom da tempo kun la bonkora frato. Koncerne horon kaj veteron, oni povas diri ke, nokto kaj tago, suno kaj pluvo, zefiro kaj akvilono⁹, estis al li tute indiferentaj en tiu momento. Li dankis do al la frato, dirante ke li deziras iri kiel eble plej rapide serĉi Agnese-n.

Kiam ili atingis la mezan straton, la frato premis al li la manon, kaj diris: «Se vi trovas tiun bonkoran Agnese, tion Dio

⁹ zefiro kaj akvilono: respektive milda kaj fortega ventoj.

volu! salutu ŝin ankaŭ mianome; kaj diru al ŝi kaj al ĉiuj, kiuj transvivas kaj memoras pri frato Cristoforo, ke ili preĝu por li. Dio vin akompanu, kaj vin benu por ĉiam».

«Ho kara patro...! ĉu ni revidiĝos? ĉu ni revidiĝos?».

«Tie supre, espereble». Kaj per tiuj ĉi vortoj li disiĝis de Renzo; kiu, haltinte por lin rigardi ĝis li malaperis, ekiris rapide direkte al la pordego, turnante dekstren kaj malen siajn lastajn kompatemajn rigardojn al tiu loko de suferoj. Vidiĝis neordinara movado, kurado de monatioj, transporto de objektoj, ĝustigo de la tendoj de l' barakoj, sintrenado de konvaleskantoj direkte al ili kaj al la portikoj, por sin ŝirmi kontraŭ la baldaŭa ŝtormego.

Fakte, apenaŭ Renzo transiris la sojlon de l' pestulejo kaj sin turnis dekstren, por retrovi la vojeton tra kiu li estis tiumatene atinginta la muregojn, komenciĝis kvazaŭ hajlado el maldensaj, impetaj gutegoj, kiuj, batante kaj re-saltante sur la blanka kaj seka vojo, levis fajnan polvo-nubeton; ili tuj fariĝis densaj; kaj antaŭ ol li atingis la vojeton, jam pluvegis kvazaŭ per siteloj. Renzo, anstataŭ maltrankviliĝi, plezuriĝis, kaj plen-ĝuis en tiu refreŝiĝo, en tiu susurado, en tiu moviĝado de herboj kaj folioj tremetantaj kaj gutantaj, denove verdaj kaj brilaj; li faris vastajn kaj plenajn spirojn; kaj en tiu elverŝo de la naturo li sentis pli klare kaj pli vive tion, kio estiĝis en lia destino.

Sed tiu sento estus eĉ pli pura kaj tuteca, se Renzo povus diveni tion, kio evidentiĝis kelk-tage pli poste: ke tiu pluvego forportis la kontaĝon; ke post ĝi, la pestulejo, se ĝi ne redonos ĉiujn gastigitojn al la vivantoj, almenaŭ ne plu glutegos da ili; ke post unu semajno, oni revidos malfermitaj pordojn kaj butikojn, oni nur parolos pri kvaranteno; ke el la pesto nenio post-restos krom eretoj ĉi tie kaj tie; la sekvaĵo, kiun tia plago ĉiufoje postlasis dum kelke da tempo.

Marŝis do gaje nia vojaĝanto, ne planinte kie, nek kiel, nek kiam, nek ĉu halti dum-nokte, nur zorgema antaŭeniri, atingi baldaŭ sian vilaĝon, trovi personon, kun kiu paroli, al kiu rakonti, kaj ĉefe por baldaŭ plu-vojaĝi direkte al Pasturo, serĉe al Agnese. Li marŝis kun la menso konfuzegita per la eventoj de tiu tago; sed el sub ĉiuj mizeroj, hororoj, danĝeroj, ĉiam aperis unu eta penso: mi ŝin trovis; ŝi resaniĝis; ŝi estas mia! Kaj tiam li faris salt-paŝon, kaj per tio li estigis akvoŝprucegon, kiel faras krisp-hara hundo elakviĝinte; alifoje

li nur frotetis la manojn; kaj antaŭen, eĉ pli arde. Rigardante la vojon, li kolektis, se tiel diri, la pensojn survoje lasitajn tiumatene kaj hieraŭ, venante; kaj eĉ pli plezure tiujn, kiujn tiam li estis klopodinta forigi: nome la dubojn, la malfacilojn trovi ŝin viva, inter tiom da mortintoj kaj mortantoj! – Kaj mi trovis ŝin viva! – li konkludis. Per la penso li revuis la plej terurajn cirkonstancojn de tiu tago; li imagis sin kun tiu pordfrapilo enmane: ĉu ŝi ĉeestos aŭ ne ĉeestos? kaj tiel malĝojiga respondo; kaj sen eĉ la tempo tiun respondon remaĉi, jen atako de tiuj frenezaj aĉuloj; kaj tiu vasta pestulejo, kvazaŭ maro! jen provu trovi ŝin en ĝi! Kaj li trovis! Li repensis tiun momenton, kiam forpasis la tuta procesio de l' konvaleskantoj: kia momento! kia korkrevo, inter ili ne trovi ŝin! kaj nun li ne plu zorgas pri tio. Kaj tiu virina kvartalo! Kaj tie, malantaŭ tiu kabano, tiel tute neatendite, tiu voĉo, ĝuste tiu voĉo! Kaj vidi ŝin, vidi ŝin stara! Sed kio? Restis ankoraŭ tiu nodo pri voto, kiel eble plej streĉita. Ankaŭ ĝi solvita. Kaj tiu malamo kontraŭ Don Rodrigo, tiu senĉesa rongado kiu pliakraĝis ĉiujn ĉagrenojn, venenis ĉiujn konsolojn: ankaŭ ĝi forigita. Tiel ke mi ne kapablus imagi pli vivan kontenton, se ĝin ne ĝenus la necerteco pri Agnese, la trista antaŭsento rilate patron Cristoforo, kaj tio ke li troviĝis ankoraŭ meze de l' pesto.

Li atingis Seston preskaŭ vespere; kaj ne ŝajnis ke l' pluvo estas ĉesonta. Sed, sentante sin plej fortika, kaj tiel embarasita trovi tranoktejon, estante cetere tiel malseka, li eĉ ne pensis pri tio. La ununura afero, kiu lin ĝenis, estis granda apetito; ĉar tia kontentego al li digestigus ege pli ol la malmulto da supo regalita de la kapuceno. Li rigardis, ĉu li trovas ankaŭ ĉi tie bakistan butikon; li ekvidis unu tian: li

ricevis du pan-bulojn per la prenilo kaj ceteraj ceremonioj. Unu panon en-poŝen kaj duan en-buŝen, kaj antaŭen.

Kiam li pasis tra Monza, jam estis tute nokte: malgraŭ tio li sukcesis trovi la urbopordon kondukantan ĝusta-vojen. Sed krom tio, kio verdire estis granda merito, vi povas imagi kia estis tiu vojo, kaj kia ĝi fariĝis de momento al momento. Profunda (kiel ĉiuj tiutempe; kaj verŝajne ni jam tion diris aliloke) inter du bordoj, kvazaŭ fluejo, oni povus tiam difini ĝin, se ne rivero, almenaŭ rojo, kaj ie kaj tie grandaj flakoj,¹ kiuj postulis fortajn klopodojn por levi la piedojn kaj la ŝuojn. Sed Renzo elturniĝis laŭpove, sen malpaciencoj, sen vortaĉoj, sen pentoj; pensante ke ĉiu paŝo, kiom ajn peniga, lin antaŭenigas, kaj la pluvo ĉesos kiam Dio volos, kaj siatempe tagiĝos, kaj ke la nun irata vojo estos tiam transirita.

Kaj mi aldonos, ke tion li pripensis nur kiam li ne povis tion eviti. Sed temis pri momentaj distriĝoj; lian menson okupis rememoro pri l' historio de tiuj pasintaj ĉagrenaj jaroj: tiom da implikoj, da malĝojaj travivaĵoj, da momentoj en kiuj li riskis malesperi, kaj taksu ĉion fiaskinta; kaj li kontraŭmetis tute alian estontecon: la alvenon de Lucia, kaj la geedziĝon, kaj la starigon de familio, kaj reciproke rakonti la okazintaĵojn, kaj la tutan vivon.

Kiel li elturniĝis, por trafi la ĝustan vojon ĉiufoje kiam li trovis disvojiĝon: ĉu lin helpis lia eta sperto kaj la duonlumo, aŭ ĉu li divenis tute hazarde; mi ne scipovus al vi klarigi, ĉar li mem, kiu pli poste kutimis rakonti sian historion tute detale, malpli koncize ol konvene (kaj ĉio supozigas, ke nia anonimulo ĝin aŭdis senpere el li pli ol unufoje), li mem ĉe tio diris ke, tiun nokton li nur memoras, kvazaŭ li ĝin trasonĝus

¹ *flakoj*: akvoplenaj vojo-kavoj.

enlite. Ĉiuokaze, ĉe l' nokto-fino li troviĝis ĉe l' bordo de Adda.

Neniam pluvhaltis; tamen, iumomente la diluvo² fariĝis pluvo, kaj poste pluveto tute subtila, tute kvieta, tute egala: la altaj kaj disaj nuboj etendis vualon seninterrompan, sed leĝeran kaj preskaŭ travideblan; kaj la helo de l' tagiĝo montris al Renzo la ĉirkaŭan pejzaĝon. En ĝi staris lia naskiĝloko; kaj ne eblas klarigi kion li sentis ĉe ties apero. Alion mi ne scipovas al vi diri, krom ke tiu montaro, tiu proksima *Resegone*-monto, la Lecco-teritorio, ĉio fariĝis kvazaŭ lia proprieto. Li turnis rigardon ankaŭ al si mem, kaj trovis sin drola: kia li imagis sian aspekton laŭ sia impresio: la tuta vestaĵaro aĉa kaj algluita al la haŭto: de la kapo ĝis la talio, tuta malsekaĵo, kvazaŭ defluilo; de la talio ĝis la piedpintoj, ŝlimo kaj koto; eĉ la liberajn partojn oni rajtus nomi kotaĵoj kaj ŝprucaĵoj. Kaj, se li rigardus sin tuta en spegulo, kun la ĉapel-randaĵo molaĉa kaj fala, kaj la haroj glatigitaj kaj algluitaj sur-vizaĝe, li des pli multe impresiĝus. Koncerne lacecon, eble li estis tia, sed tion li tute ne konsciis; kaj la tagiĝa malvarmeto, aldona al tiu de l' nokto, kaj al tiu ne eta baniĝo, nur kaŭzis en li fierecon kaj emon marŝi pli rapide.

Jen li estas en Pescate; li randas tiun lastan parton de Adda, turnante tamen melankolian rigardon al Pescarenico; li transiras la ponton; tra vojoj kaj kampoj, li post momento atingas la domon de l' amiko gastiganto. Ĉi-lasto, ĵus leviĝinta, kaj staranta ĉe l' sojlo, por esplori la veteron, levis la okulojn direkte al tiu figuro tiel malseka, tiel kotita, ni eĉ diru: tiel malpuraĉa, kaj samtempe tiel viva kaj senĝena; neniam dumvive li vidis homon pli aspektaĉan kaj pli kontentan.

² *diluvo*: proprasence: biblia inundego; ĉi tie: pluvego.

«Ho he!» li diris: «ĉu jam ĉi tie? kun tia vetero? Kio do estiĝis?».

«Ĉeestas», diris Renzo: «ĉeestas, ĉeestas».

«Ĉu sana?».

«Resaniĝinta, kio estas pli bone. Dumvive mi devas danki Dion kaj la Madonon. Sed grandajn aferojn, fajrajn aferojn: mi ĉion al vi rakontos».

«Sed kiel aĉe aranĝita!».

«Mi estas bela, ĉu?».

«Verdire, vi povus uzi la supertalion por lavi la subtalion. Sed atendu, atendu, ke mi faros al vi belan fajron».

«Mi ne rifuzas. Ĉu vi scias kie min trafis la pluvo? ĝuste ĉe l' pordego de l' pestulejo. Sed tute ne gravas! la vetero sian metion, kaj mi la mian».

L' amiko foriris kaj revenis kun du brakplenoj da ŝtipoj: li demetis unu surgrunden kaj la duan en la fajrujon, kaj, per iom da braĝoj restintaj el la hieraŭ-vespera fajro, li estigis baldaŭ belan flamaron. Renzo jam deprenis la ĉapelon, kaj skuinte ĝin du-tri foje, li ĵetis ĝin teren: ne tiel facile li deprenis ankaŭ la jakegon. Poste li eligis el la pantalona poŝeto la tranĉilon, kun tute malseka ingo, kiu aspektis akvotrempita; li metis ĝin sur benketon, kaj diris: «ankaŭ ĉi tiu estas aranĝita laŭdeve; sed, nur per akvo, nur per akvo! estu danko al la Sinjoro... Mi riskis...! Pli poste mi rakontos». Kaj li interfrotis la manojn. «Nun faru al mi alian komplezon», li aldonis: «tiun etan pakaĵon, kiun mi lasis en la supra ĉambro, bonvole iru preni, ĉar necesas ege da tempo, antaŭ ol sekiĝos la vestaĵoj, kiujn mi surportas...!».

Reveninte kun la envolvaĵo, la amiko diris: «mi supozas ke vi havas ankaŭ apetiton: mi komprenas, ke survoje da trinkaĵo tute ne mankis; sed da manĝaĵo...».

«Mi trovis por aĉeti du pan-bulojn, hieraŭ malfrue; sed verdire ili glutigis, ne tuŝante l' dentojn».

«Lasu la aferon al mi », diris la amiko: li verŝis akvon en kuir-poton, kiun poste li pendigis je l' fajruja kateno; kaj li aldonis: «mi iras melki: ĉe mia reveno kun lakto, la akvo bolos; kaj oni faras bonan polenton. Intertempe aranĝu vin senĝene».

Renzo, restinte sola, demetis, ne senpene, la ceterajn vestaĵojn, kvazaŭ glutitajn al la haŭto; li sin sekigis kaj revestis de kapo ĝis-plande. La amiko revenis kaj iris al sia kuir-poto: dume Renzo sidigis sin, atende.

«Nun mi sentas min laca», li diris: «ja estis longa marŝado! Tamen, tio ĉi estas nenio. Mi havas por rakontadi tuttage. Kiel stataĉas Milano! Kiajn aĉaĵojn oni devas vidi! Kaj kiajn aĉaĵojn oni devas tuŝi! Tiajn, ke poste oni naŭzas al si mem. Mi dirus, ke mi bezonis ne malpli ol tiu tuta banado, kiun mi ricevis. Kaj kion provis al mi fari tiuj sinjoroj! Vi aŭdos. Sed, se vi vidus la pestulejon! Tia, ke oni erarperdiĝas meze de la mizeroj. Sufiĉe; mi al vi rakontos ĉion... Kaj ŝi ĉeestas, kaj ŝi venos ĉi tien, kaj ŝi estos mia edzino; kaj vi devas roli kiel atestanto, kaj, kun pesto aŭ sen pesto, mi volas ke ni estu gajaj almenaŭ kelkhore».

Cetere li plenumis tion, kion li promesis al la amiko: ke li rakontados tuttage; des pli ke, pro l' daŭra pluveto, l' amiko trapasis la tutan tagon hejme, parte sidante apud li, parte okupite pri tinetoj kaj bareletoj³, kaj aliaj laboroj preparaj al vin-rikolto; ĉe kiuj Renzo ne evitis etendi al li man-helpon; ĉar, kiel li kutime diris, li apartenis al la homoj, kiuj pli multe laciĝas neni-farante, ol laborante. Li tamen ne sin detenis

³ *tinetoj kaj bareletoj*: lignaj ujoj por vinberoj kaj vino.

viziteti la domon de Agnese, por revidi certan fenestron, kaj ankaŭ tie inter-froti la manojn. Li revenis, vidite de neniuj; kaj li tuj enlitiĝis. Li leviĝis antaŭ la tagiĝo; kaj vidinte la pluvon ĉesinta, se ne la serenon reveninta, li ekvojaĝis direkte al Pasturo.

Kiam li alvenis, estis ankoraŭ frue: ĉar li, ne malpli ol la leganto, malpacience aspiris atingi la finon. Li demandis pri Agnese; li aŭdis ke ŝi bonfartas, kaj oni al li indikis izolan dometon, kie ŝi loĝis. Tien li iris; ŝin vokis el la strato: ĉe tia voĉo, ŝi alkuris al la fenestro; kaj, dum ŝi restis kun malfermita buŝo, por eligi mi ne scias kian vorton, kian sonon, Renzo anticipis dirante: «Lucia resaniĝis: mi ŝin vidis antaŭhierau; ŝi salutas vin; ŝi venos baldaŭ. Kaj krome, mi havas multe, multege da aferoj por al vi diri».

Ĉu pro l' surprizo de tiu apero, ĉu pro l' kontento pri l' sciigo, ĉu pro l' dezirego ekscii plimulte, Agnese komencis jen elkrii, jen demandon, nenion finante: poste, forgesante la singardojn, ĉe ŝi jam delonge kutimajn, ŝi diris: «mi venas malfermi al vi la pordon».

«Atendu: kio pri pesto?» diris Renzo: «kredeble vi ne estis trafita».

«Mi ne: kaj kio pri vi?». «Mi jes; vi devas do konduti prudente. Mi venas el Milano; kaj vi aŭdos, ke mi estis trempita en la kontaĝo ĝis-okule. Verdire mi vesto-ŝanĝis de kapo ĝisplande; sed pesto estas fiaĵo, kiu foje atakas kvazaŭ missorĉaĵo. Kaj ĉar la Sinjoro vin gardis ĝis nun, mi volas ke vi gardu vin ĝis la fino de ĉi influo; ĉar vi estas nia panjo: kaj mi volas, ke ni kune vivu sufiĉe longe kun gajo, kompanse de l' granda suferado, kiun havis ni, aŭ almenaŭ mi mem».

«Sed⁴...» ekis Agnese.

«He!» interrompis Renzo: «Nenia ‘sed’ validas. Mi scias, kion vi volas diri; sed vi aŭdos, vi aŭdos, ke neniu ‘sed’ plu restas. Ni iru en subĉielan lokon, kie oni povos paroli sendanĝere kaj senĝene; kaj vi aŭdos».

Agnese al li indikis legom-ĝardenon malantaŭ la domo; kaj ŝi aldonis: «eniru tien, kaj vi vidos du sidbenkojn, unu fronte al la alia, kiuj ŝajnas starigitaj ĝuste ĉi-cele. Mi tuj alvenas».

Renzo iris sidiĝi sur unu; post momento Agnese troviĝis sur la dua; kaj mi certas ke se la leganto, tiel informite pri l’ pasintaĵoj, povus tie troviĝi kiel tria, por vidi propra-okule tian ekscititan interparolon, aŭdi propra-orele tiujn rakontojn, tiujn demandojn, klarigojn, elkriojn, kondolencojn, gratulojn, kaj Don Rodrigon, kaj patron Cristoforo, kaj la ceteron, kaj la priskribojn de l’ estonteco, klarajn kaj pozitivajn samkiel tiujn de l’ pasinteco, mi certas, ke li ĝoj-ĝuus, kaj forirus kiel lasta. Sed mi opinias, ke li ne multe zorgas havi tiun tutan konversacion surpapere, per mutaj inkaj vortoj, trovante en ĝi nenion novan, kaj ke li preferas diveni ĝin per si mem. La konkludo estis, ke ĉiuj kune iros establi hejmon en tiu Bergama vilaĝo, kie Renzo jam havas bonan laborpostenon: koncerne la tempon: oni nenion povis decidi, ĉar tio dependis de la pesto, kaj de aliaj cirkonstancoj: tuj post ĉeso de l’ danĝero, Agnese revenos hejmen, por atendi tie Lucia-n, aŭ Lucia tie atendos ŝin: intertempe Renzo faros ofte aliajn vizitetojn al Pasturo, por vidi panjon, kaj plu informi ŝin pri eventualaj okazaĵoj.

Antaŭ ol foriri, li proponis ankaŭ al ŝi monerojn, dirante:

⁴ Sed...: Agnese aludas la voton de virgeco, faritan de Lucia.

«mi ilin ĉiujn havas ĉi tie: ankaŭ mi mem votis ne ilin tuŝi, ĝis la afero tute klariĝos. Nun, se vi bezonas da ili, alportu tason kun akvo kaj vinagro: mi enĵetas la belajn brilajn kvindek eskudojn».

«Ne, ne», diris Agnese: «por mi mem, mi havas da mono pli ol bezone: la viajn vi gardu, ĉar ili taŭgos por establi hejmon».

Renzo revenis al sia vilaĝo kun la plua konsolo, ke li trovis viva kaj sana tiel karan personon. La ceteran tagotempon kaj la sekvan nokton li restis hejme de l' amiko; la postan tagon, denove survoje, sed ali-direkten, nome al la adopta vilaĝo.

Li trovis ankaŭ Bortolon bonfarta, kaj malpli tima pri l' morbo; ĉar, dum tiuj malmultaj tagoj, ankaŭ tie la aferoj rapide alprenis bonegan direkton. Nur malmulte da homoj malsaniĝis; kaj la morbo ne plu estis kiel antaŭe; ne plu tiaj mortigaj bluaĵoj, nek tiuj perfortaj simptomoj; sed febretoj, plejparte intermitaj, kun maksimume kelke da palaj bubonetoj, kiujn oni flegis kvazaŭ ordinarajn furunkojn. La aspekto de l' vilaĝo jam ŝanĝiĝis; la transvivintoj komencis eldomiĝi, reciproke sin kalkuli kaj kondolenci kaj gratuli. Oni jam parolis pri reaktivigo de metioj: la mastroj jam strebis serĉi kaj akapari laboristojn, ĉefe en tiuj metioj, kie la laboristaro estis malabunda eĉ antaŭ la kontaĝo, kiel en la silkista metio. Renzo tute sencere promesis al la kuzo, ke li (post laŭdevaj aproboj⁵) re-dungiĝos, kiam li venos akompanate, por ekloĝi en la vilaĝo. Li dume prizorgis la plej necesajn preparojn: li trovis pli grandan domon; afero bedaŭrinde nun facila kaj nemulte kosta; kaj li ĝin provizis per mebloj kaj

⁵ aproboj: de Lucia kaj Agnese.

laboriloj, ĉi-foje tuŝante la kapitalon, sed sen granda truo, ĉar ĉio estis ete-kosta, pro tio ke da varoj estis pli multe ol da aĉetantoj.

Post mi ne scias kiom da tagoj, li revenis al la naskiĝ-vilaĝo, kiun li trovis en rimarkinde pli bona stato. Li tuj ektritis al Pasturo; li trovis Agnese-n, tute fidema kaj dispona reveni hejmen kiam ajn; tiel ke li mem ŝin rekondukis tien: kaj ni ne diros kiaj estis iliaj sentoj kaj vortoj, revidante kune tiujn lokojn.

Agnese trovis ĉion tia, kia ŝi ĝin lasis. Tiel ke ŝi ne evitis diri ke, ĉi-foje, rilate povran vidvinon kaj povran knabinon, la anĝeloj mem gardo-staris. «La alian fojon», ŝi aldonis, «oni dirus, ke la Sinjoro rigardis ali-direkten, kaj ne pensis pri ni, ĉar li permesis la rabon de nia malriĉa havaĵo; ĉi-foje li pruvis la malon, ĉar li al mi sendigis belan monsumon, per kiu mi povis rearanĝi ĉion. Mi diras ĉion, kaj mi ne diras bone; ĉar ankoraŭ mankis la dot-vestaro de Lucia, kiu estis rabita, tute nova, de tiuj viroj, kune kun la cetero; sed jen ĝi al ni venas aliflanke. Kiel kredi, se oni al mi dirus, kiam mi klopodegis por pretigi la unuan: vi opinias labori por Lucia: he, kompatinda virino! vi laboras por nekonato: nur la Ĉielo scias, kiajn personojn vestos tiu tolo, tiuj vestaĵoj: male pri la dot-vestaro, kiu fakte Lucia-n vestos, zorgos bonkorulino, kies ekziston vi tute ne konas».

La unua zorgo de Agnese estis, pretigi en sia malriĉa dometo kuŝejon kiel eble plej decan, por tiu bonkorulino: poste ŝi iris serĉi silkon por bobeni; kaj laborante ŝi forpeladis enuon.

Renzo siaflanke ne mallabore trapasis tiujn tagojn, jam per si mem tiom longajn: bonŝance li lertis pri du metioj; li re-

enlaboriĝis kiel kampulo. Parte li helpis lian gastiganton, por kiu estis tre bona ŝanco tiu-tempe havi ofte sub si laboriston tiel lertan; parte li kultivis, aŭ pli ĝuste, li igis kultivebla la legom-ĝardeneton de Agnese, tute neglektitan dum ŝia foresto. Pri sia propra bieneto, li tute ne zorgis, dirante ke ĝi estas tro taŭzita hararo, kaj ke ĝi bezonas ege pli ol du brakoj, por ĝin ordigi. Kaj li tien ne eĉ enpaŝis, kiel ankaŭ ne hejmen: ĉar la vido de tia ruinaĵo lin tro multe suferigus; kaj li jam decidis forvendi ĉion, ĉia-preze, kaj investi en la nova patrolando la enspezotan monon.

Se la transvivintoj estis reciproke kiel resurektintaj mortintoj, Renzo estis, por siaj vilaĝanoj, kvazaŭ duoble tia: ĉiu lin bonvenigis kaj gratulis, ĉiu volis aŭdi de li mem lian historion. Vi eble demandos: kaj kiel statis la afero pri la ekzilo? Bonege ĝi statis: li mem preskaŭ ne plu pripensis ĝin, supozante ke ankaŭ tiuj, kiuj povus ĝin plenumi, ne plu pripensas tion: kaj li ne trompiĝis. Kaj tio dependis ne nur de la pesto, kiu jam nuligis multege da aferoj; sed, kiel jam vidiĝis en diversaj punktoj de ĉi tiu historio, estis tiam afero tre kutima, ke la dekretoj, kaj ĝeneralaj kaj specialaj, kontraŭ personojn, ĉe manko de privata, potenca malamikeco por ilin efektivigi kaj plenumi, se ili ne efikis unuamomente, ofte restis senefikaj; kiel pafkugloj, kiuj, se ili ne cel-trafas, restas surgrunde, neniun plu ĝenante. Tio estis necesa konsekvenco de la granda facilanimeco, kun kiu tiujn dekretojn oni semis. La homa aktivo estas limigita; kaj la pluso de ordonado havis kiel konsekvencon minuson⁶ en plenumado. Laŭproverbe: ŝtofo uzita por maniko, ne uzeblas por garnaĵo.

Se iu volus ankaŭ ekscii, kiel Renzo rilatis kun Don

⁶ *pluso*: eksceso, troo; *minuson*: malpluson.

Abbondio dum tiu atenda tempo, mi diros, ke ili teniĝis reciproke distancaj: Don Abbondio, por tute ne aŭdi pri geedziĝo; kaj, ĉe tiu nura penso, li tuj vidis antaŭ si unuflanke Don Rodrigon kun ties bravuloj, aliflanke la kardinalon kun ties argumentoj: Renzo, ĉar li decidis paroli al li nur ĉe l' fina momento, por ne lin alarmi antaŭtempe, estigi, kiu do scias? malfacilon, impliki la aferon per senutilaj babiloj. Siajn babilojn li faris kun Agnese. «Ĉu vi kredas ke ŝi venos baldaŭ?» demandis la unua. «Espereble jes», respondis la alia: kaj ofte la respondinto faris post nemulte la saman demandon. Kaj per tiuj kaj tiaj artifikoj ili klopodis pasigi la tempon, kiu al ili ŝajnis des pli longa, ju pli multe da ĝi jam pasis.

Al la leganto ni tiun tutan tempon pasigos unumomente, resume dirante ke, kelktage post la vizito de Renzo al la pestulejo, Lucia eliris de ĝi kun la bonkora vidvino; ke, ĉar estis ordonita ĝenerala kvaranteno, ili pasigis ĝin kune, enfermitaj en la hejmo de ĉi-lastata; ke parton de la tempo oni okupis pretigante la dot-vestaron de Lucia, por kiu, post iom da ceremonioj, ankaŭ ŝi mem devis labori; kaj ke, kiam la kvaranteno estis finita, la vidvino konfidis por gardo la magazenon kaj la domon al sia frato komisaro; kaj oni faris la preparojn por la vojaĝo. Ni povus tuj aldoni: ili ekveturis, alveturis kaj tion kio sekvis; sed, malgraŭ la bona intenco kontentigi la urĝon de la leganto, dumtempe okazis tri aferoj, kiujn ni ne volus pretersilenti; kaj almenaŭ pri du el ili ni opinias ke eĉ la leganto malaprobis nian eventualan silenton.

La unua, ke, kiam Lucia reparolis al la vidvino pri siaj aventuroj pli detale kaj orde, ol kiel ŝi sukcesis en la ekscitiĝo de sia unua konfidenco, kaj ŝi menciis pli klare la senjorinon, kiu ŝin gastigis en la Monza monakinejo, ŝi eksciis pri ŝi

aferojn kiuj, kvazaŭ ŝlosilo pri multe da misteroj, plenigis samtempe ŝian animon per ĉagrena kaj terura miro. Fakte la vidvino ŝin informis ke la malfeliĉulino, suspektite pri kruelegaj misfaroj, estis, ordone de la kardinalo, venigita en Milanan monakinejon; ke tie, post longa furiozado kaj baraktado, ŝi pentis, ŝi kulpigis sin; kaj ke ŝia nuna vivo konsistas en volonta pentofaro tia, ke nenia homo, kiu ne volas ŝin morta, povus eltrovi pli severan. Kiu volus ekkoni iom pli detale tiun ĉi bedaŭrindan historion, tiu trovos ĝin en la libro kaj ĉe la punkto, kiun ni citis aliloke, koncerne tiun saman personon⁷.

La dua afero estas, ke Lucia, demandinte pri patro Cristoforo ĉiujn kapucenojn, kiujn ŝi sukcesis vidi en la pestulejo, eksciis, pli ĉagrene ol mire, ke li mortis pro pesto.

Fine, antaŭ sia foriro, ŝi deziris ion ekscii ankaŭ pri siaj iamaj mastroj, kaj plenumi sian devon, kiel ŝi diris, se iu el ili pluvivas. La vidvino ŝin akompanis al la domo, kie ili sciiĝis, ke ili ambaŭ transpasis al la plimulto⁸. Pri Damo Prassede, se diri ke ŝi mortis, ĉio estas dirita; sed pri Don Ferrante, konsidere ke li estis klerulo, la anonimulo taksis oportune diri iom pli longe; kaj nia-riske ni transskribos proksimume tion kion li postlasis pri li skribita.

Li do raportas, ke, ĉe l' unuaj onidiroj pri pesto, Don Ferrante estis inter la plej rezolutaj neantoj, kaj ke ĝisfine li persistis en tiu opinio; tute ne per kriaĉoj, kiel la popolo; sed per rezonoj, en kiuj neniu povos diri, ke mankis almenaŭ kunligo.

⁷ Ripam. *Hist. Pat.*, Dec. V, Lib. VI, Cap. III. (N.d. A.).

⁸ t.e. mortis.

«*In rerum natura*»,⁹ li diris, «estas nur du specoj de aĵoj: substancoj kaj akcidentoj; kaj se mi pravas, ke la kontaĝo povas esti nek unu nek alia, estos pruvite ke ĝi tute ne ekzistas, ke ĝi estas ĥimero¹⁰. Kaj jen mi. Substancoj estas aŭ spiritaj aŭ materiaj. Ke la kontaĝo estas substanco spirita, estas sensencaĵo, kiun neniu asertus; tiel ke estas senutile tion mencii. La materiaj substancoj estas aŭ simplaj aŭ kombinitaj. Nu, la kontaĝo ne estas simpla substanco; kaj tio pruviĝas per malmulte da vortoj. Ĝi ne estas aera substanco; ĉar se tia ĝi estus, anstataŭ pasi de korpo al korpo, ĝi tuj forflugus al sia sfero. Ĝi ne estas akva, ĉar ĝi malsekigus, kaj ĝin sekigus ventoj. Ĝi ne estas fajra; ĉar ĝi brulus. Ĝi ne estas tera, ĉar ĝi estus videbla. Eĉ ne kombinita substanco ĝi estas; ĉar ĝi nepre devus esti sensebla je l' okulo aŭ je l' tuŝo; kaj tiun ĉi kontaĝon kiu iam vidis? kiu ĝin tuŝis? Restas esplorote, ĉu ĝi povas esti akcidento. Des malplie. Al ni diras tiuj sinjoroj doktoroj, ke ĝi komuniĝas de korpo al korpo; kaj tiu ĉi estas ilia Aĥilo¹¹, ilia preteksto por tiom da sensencaj preskriboj. Nu, supoze ke ĝi estas akcidento, temus pri transira akcidento: du interbatalaj vortoj, ĉar, en la tuta filozofio tute ne ekzistas pli klara, pli evidenta afero ol jena: ke akcidento tute ne povas transiri de unu subjekto al alia. Kaj se, por eviti tiun ĉi Scilon, ili reduktiĝas al la aserto, ke temas pri produktita akcidento, ili trafas en Ĥaribdon;¹² ĉar, se

⁹ *in rerum natura*: latine = en la naturo. La erudiciulo faras abstraktan skolastikan rezonadon.

¹⁰ *ĥimero*: nereala imagaĵo.

¹¹ *Aĥilo*: ĉefheroo de la Helenoj en la Troja milito; ĉi tie: ĉefargumento.

¹² *Scilo* kaj *Ĥaribdo* estis du same danĝeraj mitologiaj monstroj situantaj ĉe la du flankoj de markolo.

produktite, ĝi ne komunikiĝas, ne disvastiĝas, kiel ili male babilaĉas. Post la starigo de tiuj ĉi principoj, kiu-cele al ni tiom multe paroli pri lividaĵoj,¹³ pri ekzantemoj, pri pustuloj...?». «Nur sensencaĵoj», iam ellasis aŭskultanto.

«Ne, ne», reparolis Don Ferrante: «tion ĉi mi ne diras: scienco estas scienco; sed necesas scipovi ĝin apliki. Lividaĵoj, ekzantemoj, pustuloj, parotidoj, violkoloraj bubonoj, nigreskaj furunkoj: ĉiuj ĉi estas respektindaj vortoj, ĉiu kun sia tute ĝusta signifo; sed mi diras, ke ili tute ne koncernas la problemon. Kiu do neas ke povas ekzisti da tiaj aferoj, aŭ ke da ili fakte ekzistas? Sed la tuta problemo estas: de kie ili devenas».

Ĉi tie eĉ por Don Ferrante komenciĝis la problemegoj. Dum li nur atakis la opinion pri kontaĝo, ĉie li trovis orelojn atentaj kaj disponaj: ĉar ne direblas, kiom grandas la aŭtoritato de profesia klerulo, kiam li volas demonstri al aliuloj la aferojn, pri kiuj ili jam estas konvinkitaj. Sed kiam li pasis al distingo, al la provo pruvi, ke la eraro de tiuj medicinistoj tute ne konsistas en la aserto, ke aktualas terura kaj ĝenerala malsano; sed en la eltrovo de ties kaŭzo; tiam (mi parolas pri l' unuaj tempoj, kiam oni tute ne volis aŭdi pri pesto), tiam, anstataŭ orelojn li trovis langojn ribelaj, ne trakteblaj; tiam ne plu eblis plenvoĉe prediki; kaj sian doktrinon li ne plu povis elmeti, krom intermite kaj po-pece.

«Ja ekzistas bedaŭrinde la vera kaŭzo», li diris; kaj ĝin devas agnoski eĉ tiuj kiuj pledas por tiu alia tute senbaza... Ili negu do, se ili povas, tiun fatalan konjunkcion de Saturno kun

¹³*lividaĵoj* kaj pli sube: *ekzantemoj*, *pustuloj*, *parotidoj*, *violkoloraj bubonoj*, *nigreskaj furunkoj*: simptomoj de tiu malsano, kiun Don Ferrante ne volis nomi pesto.

Jupitero¹⁴. Kaj kiam do aŭdiĝis, ke influoj propagiĝas¹⁵...? Kaj ĉu tiuj moŝtoj aŭdacus nei la influojn? Ĉu ili neos la ekziston de astroj? Aŭ ĉu ili diros, ke ili ŝvebas tie supre nenifare, samkiel tiom da pinglo-kapoj enpikitaj en kuseneto...? Sed jenon mi tute ne povas kompreni, koncerne tiujn sinjorojn medicinistojn: konfesi ke ni staras sub tiel maligna konjunkcio, kaj samtempe al ni diri, kun tute senhonta mieno: ne tuŝu ĉi tie, ne tuŝu tie, kaj vi estos sekuraj! Kvazaŭ oni povus, evitante materian kontakton de l' surteraj korpoj, eviti la virtualan¹⁶ potencon de l' ĉielaj. Kaj tia fervoro bruligi ĉifonojn! Kompatindaj homoj! ĉu vi bruligos Jupiteron? ĉu vi bruligos Saturnon?». *His fretus*¹⁷, tio estas surbaze de tiaj ĉi belaj fundamentoj, li tute ne gardis sin kontraŭ pesto; ĉi lasta atakis lin; li enlitiĝis, por morti, kulpigante la stelojn, kvazaŭ heroo de *Metastasio*¹⁸. Kaj kio pri tiu fama biblioteko? Eble ĝi ankoraŭ ie kuŝas disperdite sur muretoj.

¹⁴ *konjunkcio*... *Jupitero*: pozicio de du planedoj, ĉi-kaze Saturno kaj Jupitero, havantaj unu saman rektan ascension (ŝajnan supreniĝon super la horizonto). Laŭ astrologiaj teorioj, tio ĉi estis malbonaŭgura.

¹⁵ *propagiĝas*: disvastiĝas.

¹⁶ *virtualan*: astrologian.

¹⁷ *His fretus*: latine = tion fidante.

¹⁸ *Metastasio*: itala sentimentala dramverkisto (1698-1792).

XXXVIII

Ian vesperon Agnese aŭdas kaleŝon ekhalti ĉe l' pordo. – Estas ŝi mem, certe! – Estis ĝuste ŝi, kun la bonkora vidvino. La reciprokajn salutojn imagu la leganto.

La postan fru-matenon hazarde alvenas Renzo, kiu nenion scias, kaj nur venas por iom ellasi al Agnese sian malpaciencon pro tiel granda malfruo de Lucia. Ankaŭ liajn agojn kaj vortojn ni lasas al la imago de la leganto. Male, la esprimoj de Lucia estis tiaj, ke ne multe bezonatas, por ilin priskribi. «Mi salutas vin: kiel vi fartas?» ŝi diris, kun mallevitaj okuloj, kaj sen malkvieto. Kaj vi ne kredu, ke Renzo trovis tian agmanieron tro seka, kaj ke tial li ofendiĝis. Male li akceptis la aferon laŭ ĝusta maniero; kaj kiel ĉe l' komplimentoj de edukitaj homoj, oni kompreneble dekalkulas troigon, tiel ĉe l' vortoj de Lucia li tute komprenis, ke ili esprimas nur parteton de tio, kio trapasas ŝian koron. Cetere, oni facile komprenis, ke Lucia havis du diversajn manierojn eldiri tiujn vortojn: unu por Renzo, alian por ĉiuj ceteraj konatoj.

«Mi bonfartas, kiam mi vidas vin», respondis la junulo, per frazo antikva, sed kiun tiumomente li mem inventus.

«Nia povra patro Cristoforo...!» diris Lucia: «vi preĝu por lia animo: kvankam oni povas preskaŭ certi, ke nun li mem preĝas enĉiele por ni».

«Mi tion atendis, bedaŭrinde», diris Renzo. Kaj oni en tiu interparolo tuŝis ankaŭ aliajn malĝojajn temojn. Kio tamen? Pri kio ajn temis, ĉiufoje la interparolo estis plezura. Kiel tiuj kapricaj ĉevaloj, kiuj obstine ekhaltas, kaj tie fiksiĝas, kaj alterne levas unu piedon kaj alian, kaj ĝin refiksas samloke, kaj faras mil ceremoniojn, antaŭ ol ekpaŝi; sed fine ili subite

ekiras, kaj for, kvazaŭ portate del l' vento, tiele por li fariĝis la tempo: unue la minutoj ŝajnis horoj; poste la horoj ŝajnis minutoj.

La vidvino, ne nur ne ĝenis la kompanion, sed tre ĝoje troviĝis en ĝi; kaj Renzo, kiam li ŝin vidis en tiu liteto, certe ne imagis ŝin tiel sociema kaj gajhumora. Sed pestulejo kaj kamparo, morto kaj geedziĝo, ne estas samaj aferoj. Kun Agnese ŝi jam amikiĝis; kun Lucia, estis plezure vidi ŝin tenera kaj samtempe ŝercema, kaj kiel ŝi incitetis ŝin bontone kaj diskrete, nur sufiĉe por ŝin devigi elmontri la tutan ĝojon, kiun ŝi havis ankore.

Renzo fine diris, ke li iros al Don Abbondio, por akordiĝi pri la geedziĝo. Li aliris, kaj, kun sinteno inter ŝercema kaj respektema, «sinjoro parokestro», al li diris: «ĉu forpasis tiu kapdoloro, pro kiu vi iam diris, ke vi ne povas geedzigi nin? Nun la tempo oportunas: la edzino ĉeestas: kaj mi estas ĉi tie, por aŭdi, kiam estos al vi komforte: sed ĉi-foje mi aŭdacas peti, ke vi bonvolu rapidi». Don Abbondio ne respondis nee; sed komencis heziti, trovi aliajn pretekstojn, enŝovi aliajn aludojn: kaj kial diskonigi sin, kaj laŭt-proklamigi lian nomon, kun tiu kapt-ordono super li? kaj ke oni povas egale la aferon aranĝi aliloke, kaj tiel plu kaj tiel plu.

«Mi komprenis», diris Renzo: «vi ankoraŭ havas iom da tia kapdoloro. Sed, aŭdu, aŭdu». Kaj li komencis priskribi, en kia stato li vidis la povran Don Rodrigon; kaj ke preskaŭ certe nun li estas forpasinta. «Espereble», li konkludis, «la Sinjoro al li kompatis».

«Tio ĉi tute ne koncernas la aferon», diris Don Abbondio: «ĉu mi rifuzis? Mi ne rifuzas; mi parolas... mi parolas surbaze de pravaj rezonoj. Cetere, vidu, dum spiro restas... Rigardu

min mem: mi stataĉas kiel fendita pelvo; eĉ mi mem estis pli morta ol viva: kaj jen mi ĉi tie; kaj... se ne alvenas malfeliĉoj... sufiĉe... mi povas esperi pluvivi iomete. Imagu do iujn temperamentojn. Sed, mi ripetas, tio ĉi tute ne koncernas la aferon».

Post kelke da pluaj batoj kaj rebatoj, nek pli nek malpli konkludaj, Renzo afektis belan riverencon, kaj revenis al sia kompanio, faris sian raporton, kaj finis dirante: «mi foriris, estante kolerplena, por ne riski senpacienciĝi, kaj lin malrespekti. Iumomente li aspektis kiel la alian fojon; sama paŭto, samaj argumentoj: mi certas ke, se la afero daŭrus iom pli longe, li elpaŝus per latinaj vortoj. Mi vidas ke riskas okazi alia prokrastaĉo: preferindas fari ĝuste laŭ lia diro: iri geedziĝi tie, kien ni translokiĝos».

«Ĉu vi scias, kion ni faru?» diris la vidvino: «mi volas ke ni, la virinoj, faru alian provon, kaj vidu, ĉu ni sukcesos pli bone. Tiel ankaŭ mi mem havos la plezuron konatiĝi kun tiu viro, ĉu li vere estas tia, kiel vi diras. Mi volas ke ni iru post-tagmanĝe; por ne tuj denove ataki lin. Nun, sinjoro fianĉo, konduku nin ambaŭ al promeno, dum Agnese mastrumas hejme: mi mem al Lucia patrinos:¹ kaj mi havas grandan emon vidi pli bone tiujn ĉi montojn, tiun ĉi lagon, pri kiu multe mi aŭdis; kaj la malmulto, kiun mi jam vidis, vere al mi ŝajnas mirinda belaĵo».

Renzo antaŭ ĉio kondukis ilin al la domo de lia gastiganto, kie okazis alia festo-plena akcepto; kaj oni lin promesigis, ke ne nur hodiaŭ, sed ĉiutage laŭpove li venos tagmanĝi kun ili.

¹ Tiam bonmora gefianĉa paro ne rajtis forpromeni ne akompanate de tria persono.

Post la promeno kaj la tagmanĝo, Renzo foriris, ne dirinte kien. La virinoj iom longe interparolis, interkonsiliĝis pri la maniero kapti Don Abbondion; kaj fine ili iris al la sturmo.

– Jen venas la virinoj, – diris en si mem la pastro; sed li afektis indiferentan mienon: grandajn gratulojn al Lucia, salutojn al Agnese, komplimentojn al la fremdulino. Li sidigis ilin, kaj tuj li komencis paroli pri la pesto: li volis aŭdi el Lucia, kiel ŝi travivis tiujn malfeliĉojn: la pestulejo havigis ankaŭ al ŝia kunulino la oportunon paroli; poste, kiel prave, Don Abbondio parolis ankaŭ pri sia tempesto; pliposte, grandajn gratulojn ankaŭ al Agnese, pro tio ke ŝi elglitis sendifekte. La afero treniĝis longaĉe: ek de la unua momento la du oldulinoj tre atentis, por trafi oportunon tuŝi la esencan temon: fine unu el ili malfrostigis la situacion. Sed kion diri? Don Abbondio tute surdis ĉi-teme. Li ne respondis rifuze; sed jen denove tiu tia serpumado, turniĝado, saltado de unua al deka. «Necesus», li diris «havi la eblecon forviŝigi tiun kapt-ordonaĉon. Vi, sinjorino, kiu loĝas en Milano, supozeble iom konas la gvid-fadenon de la aferoj, verŝajne vi havas bonajn protektantojn, ian gravan kavaliron: ĉar per tiaj ĉi rimedoj ĉia vundo saniĝas; sed se voli solvi pli rekte la problemon, ne implikiĝante en tiom da danĝeroj, konsidere ke tiuj ĉi gejunuloj, kaj ĉi-nia Agnese intencas elmigri (kaj mi ne scius, kion diri: patrolande estas tie, kie oni bonstatas), al mi ŝajnas ke oni povus fari ĉion tie, kie kapt-ordono tute ne validas. Mi malpacience atendas la tempon, kiam mi scios tiun ĉi geedziĝon aranĝita, sed mi volus ĝin aranĝita bonorde kaj trankvile. Mi diras la veron: ĉi tie, kun tiu aktuala kapt-ordono, distrumpeti publike ĉe-altare tiun nomon Lorenzo Tramaglino, tion mi ne farus kvieta-kore: mi tro amas lin; mi

timus, ke mi faras al li mis-servon. Vidu via moŝto, vidu vi ambaŭ».

Ĉe tio, jen Agnese, jen la vidvino, rebatis tiujn rezonojn; jen Don Abbondio reproponis ilin ali-forme: kaj ĉiufoje oni estis denove ĉe l' komenco; kiam eniras Renzo kun firma paŝo, kaj kun sciigo survizaĝe; kaj li diras: «alvenis sinjoro markizo ***».

«Kion signifas tio? alvenis kien?» demandas Don Abbondio, leviĝante.

«Li alvenis al sia palaco, aparteninta al Don Rodrigo, ĉar tiu ĉi sinjoro markizo estas tiel dirita fideikomisulo²; tiel ke ne plu estas dubinde. Miaflanke, mi ĝojus, se mi povus ekscii, ke tiu povrulo mortis pie. Ĉiuokaze, ĝis nun mi preĝadis por li per *Patronia*, ek de nun mi preĝos per *De profundis*³. Kaj tiu ĉi sinjoro markizo estas tute bonmora viro».

«Certe», diris Don Abbondio: «mi aŭdis plurfoje mencii lin vere bonkora senjoro, antikva-stila persono. Sed ĉu tio ver-veras...?». «Ĉu vi kredas al la sakristiano?». «Kial?». «Ĉar li vidis lin propra-okule. Mi estis nur en la ĉirkaŭaĵo, kaj verdire mi iris ĝuste tien, ĉar mi pensis: tie oni nepre scias ion. Kaj pli ol unu homo al mi diris la samon. Poste mi renkontis Ambrogion, kiu venis ĝuste de tie supre, kaj vidis lin tie kiel mastron. Ĉu vi Ambrogion volas aŭdi? Mi restigis lin ĉe la pordo ĝuste ĉi-cele».

«Ni aŭdu», diris Don Abbondio. Renzo iris voki la sakristianon. Ĉi-lastata konfirmis la aferon ere kaj detale, aldonis aliajn cirkonstancojn, solvis ĉiujn dubojn; kaj poste

² *fideikomisulo*: ricevinto *fideikomison*, tio estas heredaĵon uzotan profite al tria persono.

³ *Patronia*: preĝo por vivantoj; *De profundis*: preĝo por mortintoj.

foriris.

«Ha! li mortis do! li vere forpasis!» elkriis Don Abbondio. «Vi ja vidas, filetoj, ĉu la Providenco fine trafas iujn ulojn. Vi scias, ke estas grandiozaĵo! granda senpeziĝo por tiu ĉi povra vilaĝo! Ĉar kun li la vivo estis neeltenebla. Tiu ĉi pesto estis ja granda plago; sed ĝi estis ankaŭ *balailo*; ĝi forbalais iujn homojn, el kiuj, miaj filetoj, ni ne plu liberiĝus; verdaj ili estis, freŝaj, prosperaj: oni dirus, ke la pastro celebronta ilian sepulton, ankoraŭ studis en seminario latinajn elementojn⁴. Kaj jen en palpebrum-daŭro ili malaperis centope. Ni ne plu vidos lin ĉirkaŭmarŝi kun tiaj soldataĉoj malantaŭe, kun tia fiereco, kun tia mieno, kun tia aplombo kvazaŭ li havus foston enkorpe, kun tia maniero disrigardi la homojn, kvazaŭ ĉiuj vivus nur dank' al lia degno. Kaj nune li ne plu estas, kaj ni plu vivas. Li ne plu sendos da tiaj ambasadoj al honestuloj. Li ĝenegis nin ĉiujn, vidu: ĉar nun ni povas tion diri».

«Mi pardonis lin elkore», diris Renzo.

«Kaj per tio vi faras vian devon», respondis Don Abbondio: «sed oni rajtas ankaŭ danki la Ĉielon, ke ni liberiĝis. Nun, revenante al nia temo, mi al vi ripetas: vi faru laŭ via bontrovo. Se vi volas, ke mi mem geedzigu vin, jen mi; se al vi estas pli komforte alimaniere, vi mem decidu... Koncerne la kapt-ordonon, ankaŭ mi mem vidas ke, ĉar neniu plu estas, kiu celus vin, kaj intencus al vi malbonfari, ne estas afero por maltrankviliĝi: des pli ke validas tiu amnestia dekreto, okaze de l' naskiĝo de l' serenega infanto⁵. Kaj krome, la pesto! la pesto! ĝi blank-farbis multege da aferoj!

⁴ *studis... latinajn elementojn*: estis ankoraŭ juna studento.

⁵ *infanto*: titolo de la hispanaj reĝidoj.

Tiel ke, se vi volas... hodiaŭ estas ĵaŭde... dimanĉe mi anoncas⁶ vian geedziĝon enpreĝeje; ĉar tio, kio estis farita alifoje, ne plu validas, post tiom da tempo; kaj poste mi mem havos la ĝojon geedzigi vin.

«Vi ja scias, ke ĝuste ĉi-cele ni venis ĉi tien», diris Renzo.

«Bonege; kaj mi servos vin: kaj mi volas tuj sciigi lian eminencon».

«Kiu estas lia eminenco?» demandis Agnese.

«Lia eminenco», respondis Don Abbondio, «estas nia kardinalo ĉefepiskopo, kiun Dio gardu».

«Ho! koncerne ĉi tion, pardonu min», replikis Agnese: «ĉar, kvankam mi estas povra malklerulino, mi povas certigi vin, ke oni ne tiele titolas lin; ĉar, kiam ni estis duafoje ĉe li por paroli kun li, samkiel mi nun parolas kun vi, unu el tiuj sinjoroj pastroj apartigis min, kaj min instrukciis kiel trakti kun tiu sinjoro, kaj ke oni devas lin voki via eminenta moŝto kaj monsinjoro».

«Kaj nun, se li devus denove vin instrukcii, li al vi dirus, ke vi devas lin titoli eminenco: ĉu vi komprenis? Ĉar la papo, Dio gardu ankaŭ lin, preskribis, ek de la monato junio, ke kardinalojn oni tiele titolu. Kaj ĉu vi scias, kial supozeble li alvenis al ĉi tia decido? Ĉar la titolo eminenta, iam rezervita al kardinaloj kaj al iuj princoj, nun, ankaŭ vi mem vidas, al kiom da homoj estas dirata: kaj kiel volonte oni ĝin suĉas! Kaj kion faru la papo? Forigi ĝin de ĉiuj? Jen plendoj, apelacioj, ĉagrenoj, ĝenoj; kaj krome, daŭrigi kiel antaŭe. Li do eltrovis tre taŭgan rimedon. Poste, iom post iom oni komencos titoli

⁶ *anoncas*: antaŭ ol celebri geedziĝon, parokestroj devis publike anonci ĝin trifoje.

eminenco la episkopojn⁷; poste ĝin postulos la abatoj, poste la prepostoj; ĉar tiaj estas la homoj; ili volas pli kaj pli rang-altiĝi; poste la kanonikoj...». «Poste la parokestroj», diris la vidvino.

«Ne, ne», respondis Don Abbondio: «parokestroj tiraĉu azenan ĉareton: ne timu ke oni la parokestrojn tro-dorlotos; al ili la titolo respektinda ĝis la mondo-fino. Male, mi tute ne mirus, se la kavaliroj, kutimaj titoliĝi eminentaj samkiel la kardinaloj, iam volus ankaŭ ili mem la titolon eminenco. Kaj se ili ĝin volas, vidu, ili iam trovos haviganton. Kaj tiuokaze la tiama papo eltrovos alian titolon por la kardinaloj. Nu, ni revenu al niaj aferoj: venont-dimanĉe mi anoncos vian geedziĝon enpreĝeje; kaj dume, ĉu vi scias, kion mi elpensis, por pli taŭge vin servi? Dume ni petos rajtigon ne fari la du pluajn anoncojn. Oni estas jam mult-okupita ĉe tiaj rajtigoj tie, en la kurio,⁸ se la aferoj iras ĉiuloke kiel tie ĉi: por la venonta dimanĉo, mi jam havas... unu... du... tri; ne kalkulante vin mem; kaj povus aldoniĝi pluaj. Kaj plue vi vidos, kiel grandioza afero ĝi fariĝos: eĉ ne unu devos resti ne parigita. Veran fuŝaĵon faris Perpetua, mortinte ĝuste nun; ĉar nun estas la momento, kiam ankaŭ ŝi mem trovos klienton. Kaj ankaŭ en Milano, sinjorino, mi imagas, ke estas same».

«Tute jes! imagu ke nur en mia paroko, la pasintan dimanĉon, kvindek anoncoj».

«Ĝuste tion mi diras; la mondo tute ne volas finiĝi. Kaj koncerne vin, sinjorino, ĉu ne komencis ĉirkaŭzumi flirtuloj?». «Ne, ne, mi tion ne pensas, nek pensi volas».

⁷ *episkopoj*, kaj pli sube: *abatoj*, *prepostoj*, *kanonikoj*, *parokestroj* estas diversrangaj katolikaj pastroj.

⁸ *kurio*: supera eklezia instanco.

«Jes, jes, vidu, ĉu vi volos resti sola. Eĉ Agnese, vidu; eĉ Agnese...». «Hu! vi ŝercemas, vi», ŝi diris.

«Certe, ke mi ŝercemas: kaj al mi ŝajnas, ke estas konvena tempo, fine. Ni travivis malfeliĉajn aferojn, ĉu ne, miaj gejunuloj? malfeliĉojn ni travivis: la tri-kvar tagoj, dum kiuj ni povas ankoraŭ resti en ĉi mondo, estos espereble iom pli bonaj. Nu! feliĉas vi, ĉar, se ne okazos misfortuno, vi havas ankoraŭ longan tempon por rakonti pri l' pasintaj malfeliĉoj: koncerne min, mi jam estas je la dudektria kaj tri kvaronoj⁹, kaj... friponoj ja povas morti; el pesto oni povas resaniĝi; sed kontraŭ jaroj ne estas rimedo: kaj, laŭdire, *senectus ipsa est morbus*.¹⁰»

«Nun», diris Renzo: «vi ja parolu latine laŭvole; ĉar tio al mi tute ne interesas».

«Vi ankoraŭ koleras kontraŭ latinon; bone, bone, mi aranĝos vin: kiam vi venos kun tiu ĉi knabino, ĝuste por aŭdi latinajn¹¹ vortetojn, mi al vi diros: latinon vi ne volas: foriru en paco. Ĉu tio al vi plaĉos?». «He! mi ja scias, kion mi diras», respondis Renzo; «tia latino tute ne timigas min: tiu estas sincera, sanktega latino, samkiel tiu de l' sankta meso: eĉ pastroj devas legi nur tion, kio kuŝas sur-libre. Sed mi parolas pri tiu latino fripona, ekster-preĝeja, kiu perfide atakas, kerne de interparolo. Ekzemple, mi tion diru nun, kiam ĉio finiĝis; tiu latino, kiun vi eltrovis, ĝuste en tiu angulo, por al mi kredigi, ke vi ne povas, ke alio bezonatas, kaj mi ne scias kio; nun al mi traduku ĝin en popollingvon».

⁹ je la dudektria kaj tri kvaronoj: t.e. proksima al morto.

¹⁰ *senectus... morbus*: latina proverbo = maljunaĝo per si mem estas malsano.

¹¹ tiamaj romkatolikaj ritoj estis latinlingvaj.

«Silentu, bufono, silentu: ne reaktu ĉi-aferojn: ĉar, se ĉion prikalkuli, mi ne scias kiu do kreditus. Mi ĉion pardonis: ni ne plu preparolu tion: sed ĉiuokaze vi al mi faris misan ŝercon. Pri vi, Renzo, mi ne miras, ĉar vi estas misfarulo; sed mi aludas ĉi ŝajnan kvietulinon, ĉi sanktulinuleton, ĉi trapikitan madoneton: malfidi ŝin ŝajnis peke. Sed mi ja scias, kiu ŝin instrukiis, mi ja scias, mi ja scias». Tion dirante, li direktis al Agnese la montrofingron, antaŭe celitan al Lucia: kaj ne eblas klarigi kiel indulgeme, kiel sprite li faris tiujn riproĉojn. La sciigo pri la morto de Don Rodrigo al li donis senĝenecon, parolfacilon, ĉe li delonge ne kutimajn; kaj ni estus ankoraŭ for de la fino, se ni intencus raporti la tutan ceteran konversacion, kiun li daŭrigis longe, plurfoje retenante la societon, kiu volus foriri, kaj haltigante ĝin ankoraŭ iomete ĉe l' pordego, daŭre parolante pri bagateloj.

La postan tagon Don Abbondion trafis vizito des pli ŝatata, ju malpli atendita: la sinjoro markizo, pri kiu oni temis: viro inter la matura kaj la maljuna aĝo, kies aspekto estis kvazaŭ atestilo pri tio kion la famo taksis pri li: elkora, afabla, paca, humila, digna, kun esprimo de rezignacia malgajo.

«Mi venas», li diris, «por al vi transdoni la salutojn de l' kardinalo ĉefepiskopo».

«Ho, kia degno de ambaŭ!». «Kiam mi iris adiaŭi tiun senkomparan viron, kiu min honoras per sia amikeco, li al mi parolis pri du gejunuloj de tiu ĉi paroko, gefianĉoj trafitaj de malfeliĉoj kaŭze de l' povra Don Rodrigo. Monsinjoro deziras ricevi sciigojn pri ili. Ĉu ili vivas? Kaj ĉu iliaj aferoj estas aranĝitaj?». «Ĉio aranĝita. Mi eĉ intencis skribi pri tio al lia eminenco; sed nun, ĉar mi havas la honoron...».

«Ĉu ili estas ĉi tie?». «Ĉi tie; kaj ili geedziĝos kiel eble

plej baldaŭ».

«Kaj mi petas, ke vi al mi diru, ĉu eblas al ili bonfari, kaj min instruu pri plej konvena maniero tion plenumi. En tiu ĉi katastrofo mi perdis la nurajn du filojn, kiujn mi havis, kaj ilian patrinon, kaj mi ricevis tri rimarkindajn heredaĵojn. Da superfluaĵo mi havis jam antaŭe: tial vi vidas, ke havigi al mi oportununon, kaj des pli ĉi-tian, por disponigi parton de ĝi, signifas fari al mi veran servon».

«La Ĉielo vin benu! Kial la...¹² ne ĉiuj kondutas kiel vi? Sufiĉe; ankaŭ mi mem dankas vin elkore por tiuj ĉi filetoj. Kaj ĉar via eminentega moŝto tiom multe kuraĝigas min, jes sinjoro, mi havas rimedon por al vi sugesti, kiu verŝajne al vi ne malplaĉos. Sciu do via moŝto, ke tiuj ĉi bonuloj estas decidintaj starigi hejmon aliloke, kaj vendi la malmulton kiun ili posedas subsune ĉi tie: la junulo malgrandan vinberarbon, vastan naŭ aŭ dek perĉeojn, se mi ne eraras, sed tute neglektitan: oni taksu nur la grundon, nenion pluan; plus unu dometon li, kaj alian la fianĉino: du loĝejaĉoj, vidu. Senjoro kia via moŝto scii ne povas, kio trafas malriĉulojn, kiam ili volas forvendi siajn posedaĵojn. Oni ĉiam trafas en buŝegon de ruzulo, kiu eble jam de longe amindumas kun tiu terpeceto, kaj kiam li ekscias, ke la alia tute bezonas vendi, li afektas rifuzon; oni devas lin persekuti, kaj al li vendi kontraŭ panpeco: des pli en cirkonstancoj kiel la nunaj. Via markiza moŝto jam komprenis, kien celas mia parolo. Plej eminenta karitato, kiun via eminentega moŝto povas fari al tiuj ĉi homoj, estas ilin elturni el ĉi tiu impliko, aĉetante ilian modestan posedaĵon. Verdire mi esprimas profiteman opinion, ĉar

¹² *la...* subkomprenate: la nobeloj

tiumaniere mi akirus en mia paroko altrangan kunpatronon¹³, kia estas sinjoro markizo; sed via moŝto decidis laŭ sia bontrovo: mi parolis nur por obei».

La markizo tre laŭdis la sugeston; li dankis al Don Abbondio, kaj lin petis arbitracii mem pri l' prezo, kaj ke li fiksu ĝin tre alta. Kaj li ŝtonigis lin, proponante, ke tuj oni iru kune al la hejmo de l' estonta edzino, kie verŝajne troviĝos ankaŭ la edzo.

Survoje, Don Abbondio, tute ĝoj-verva, kiel vi povas imagi, elpensis kaj eldiris alian aferon. «Ĉar via eminentega moŝto estas tiom inkлина bonfari al ĉi-homoj, estus alia helpo por fari al ili. Super la junulo ŝvebas kapt-ordono, speco de ekzil-dekreto, pro eta fuŝaĵo, kiun li faris en Milano antaŭ du jaroj, en la tago de tiu tumultaco, en kiu li troviĝis implikita senmalice, krudulaĉe, kvazaŭ muso en kaptilo; nenio serioza, vidu: knabaĵoj, vent-kapaĵoj: vere malbonfari li tute ne kapablas: kaj tion diri rajtas mi, kiu lin baptis kaj vidis lin kreski: kaj krome, se via moŝto degnus aŭskulti ĉi-povrajn homojn paroli krudaĉe, vi povas demandi, ke li mem rakontu, kaj vi aŭdos. Nun, ĉar temas pri pasintaj aferoj, neniun plu lin ĝenas; kaj kiel mi al vi diris, li intencas elmigri eksterlanden; sed, ĉe l' tempo-paso, aŭ ĉe reveno ĉi tien, aŭ neniun scias kio, vi min instruas, ke ĉiam preferindas ne esti skribita sur tiaj libroj. Sinjoro markizo en Milano prave gravas, kiel granda kavaliro kaj granda homo... Ne, ne, lasu min diri; ĉar la vero postulas sian spacon. Rekomendo, vorteto de homo viaranga, valoras pli ol bezone por havigi konvenan absolvon».

«Ĉu ne estas gravaj puntilioj kontraŭ ĉi tiu junulo?». «Ne, ne; mi ne kredas. Oni fajrumis kontraŭ lin unuamomente; sed

¹³ tiam bienuloj estis patronoj t.e. protektantoj de parokoj.

nun mi kredas ke restas nur la nura formalajō».

«Se tiel statas la afero, ĝi estos facila; kaj volonte mi surprenas ĝin».

«Kaj vi ne volas ke oni vin diru granda senjoro. Mi tion diras kaj volas diri; spite vin, mi volas tion diri. Kaj eĉ se mi silentus, tio vanus, ĉar ja ĉiuj tion priparolas; kaj *vox populi, vox Dei*.¹⁴».

Ili trovis ĝuste la tri virinojn kaj Renzon. Kiel ĉi-lastaj impresiĝis, mi lasas vin mem imagi; kaj mi kredas ke eĉ tiuj nudaj kaj malglataj vandoj, kaj la fenestro-kovriloj, kaj la benketoj, kaj la manĝuoj miris pri tiel eksterordinara vizito. Li mem komencis la konversacion, parolante pri l' kardinalo kaj l' aliaj aferoj, kun malfermita elkoreco, kaj samtempe kun delikata diskreteco. Poste li transis al la propono, por kiu li venis. Don Abbondio, de li petite fiksi la prezon, ekstaris, kaj post iom da ceremonioj kaj pardonpetoj, kaj ke li ne estas kompetenta, kaj ke li povus nur blinde palpserĉi, kaj ke li parolas nur por obei, kaj ke li tute sin konfidas, fine eldiris, liaopinie, troaĵon. La aĉetanto diris, ke siaflanke li estas kontentega, kaj kvazaŭ li miskomprenus, li diris la duoblon; li ne volis aŭskulti ĝustigojn, kaj li interrompis kaj finis ĉian parolon, invitante la kompanion tagmanĝi, la tagon post la geedziĝo, en lia palaco, kie oni faros formalan aĉet-vendan dokumenton.

– Ha! – diris en si mem Don Abbondio reveninte hejmen: – se la pesto farus ĉiam kaj ĉiuloke ĉi-tiel, estus tute malprave mallaŭdi ĝin; oni preskaŭ bezonus unu tian ĉiu-generacie; kaj oni povus eĉ pakti ke ĝi atakos; kondiĉe ke oni resaniĝu, nu! –

Alvenis la kuria rajtigo, alvenis la absolvo, venis tiu

¹⁴ Latina proverbo = popolvoĉo estas Dia voĉo.

benata tago: la duopo iris kun triumfa maltimo ĝuste en tiun preĝejon, kie ĝuste per Don Abbondio ili estiĝis geedzoj. Alia, eĉ pli eksterordinara triumfo estis la iro en tiun palacon; kaj mi lasas vin mem imagi, kio do pasis tra ilia cerbo, ĉe tiu supreniro, ĉe l' eniro tra tiu pordego; kaj kiajn parolojn ili faris, ĉiu laŭ sia temperamento. Mi nur aludos, ke, meze de l' gajo, jen unu jen alia menciis ke, por plenigi la feston, nur mankas la povra patro Cristoforo. «Sed aliflanke», oni aldonis, «li statas pli bone ol ni, tutcerte».

La markizo tre festis ilin, li kondukis ilin en belan antaŭkuirejon, altabligris la geedzojn, kun Agnese kaj la komercistino; kaj antaŭ ol apartiĝi por tagmanĝi en alia ĉambro kun Don Abbondio, li volis resti iomete kompanie kun la invititoj, kaj li eĉ helpis tablo-servi ilin. Espereble neniu taksos, ke estus pli simple aranĝi unu nuran manĝo-tablon. Mi al vi prezentis lin bonkora, sed ne ekstravaganca; mi al vi diris ke li estis humila, tute ne ke li estis mirindaĵo de humileco. Li havis da ĝi sufiĉe por subnivelegi je tiuj bonmoruloj, sed ne por samnivelegi.

Post la du apartaj tagmanĝoj, estis redaktita la kontrakto per iu doktoro, kiu ne estis Impliktrafulo. Ĉi-lasto, pli ĝuste: lia korpa restaĵo, kuŝis kaj ankoraŭ kuŝas en Canterelli. Kaj mi mem komprenas ke, por ne loĝantoj en tiuj lokoj, tio postulas klarigon.

Eble duon-mejlon super Lecco, preskaŭ flanke de alia vilaĝo nome Castello, troviĝas loko nomita Canterelli, kie kruciĝas du stratoj; kaj unuflanke de l' voj-kruciĝo vidiĝas altaĵo, kvazaŭ artefarita monteto, kun kruco surkulmine; ĝi nenio estas krom amaso da mortintaj en tiu kontaĝo. Verdire la tradicio nur diras: mortintoj el la kontaĝo; sed certe temas

pri tiu, kiu estis la lasta, kaj plej terura, pri kiu restas memoro. Aliflanke vi ja scias, ke la tradicioj, ne helpate, per si mem diras ĉiam tro malmulte

Dum-revene ne okazis alia ĝenaĵo, krom ke Renzon iom malhelpis la pezo de l' moneroj, kiujn li forportis. Sed tiu viro, kiel vi scias, jam eltenis ege pli akrajn aferojn en sia vivo. Mi prisilentas lian ne-bagatelan cerbumadon, pri plej bona maniero ilin investi. Vidante la projektojn trapasantajn tiun cerbon, kaj la pripensojn, kaj la imagojn; aŭdante la porajn kaj kontraŭajn argumentojn, por agrikulturo kaj por industrio, estis kvazaŭ kontraŭstaro de du akademioj¹⁵ de la pasinta jarcento. Sed por li la embaraso estis pli reala, ĉar, pro tio ke li estis unu nura homo, ne eblis al li diri: kial elekti? kaptu do ambaŭ; ĉar entute la rimedoj estas samaj; kaj ili estas du kiel la homkruroj, kiuj duope marŝas pli bone ol unuope.

Oni nur zorgis kunmeti pakaĵojn kaj ekvojaĝi: la Tramaglino-familio por la nova patrolando, kaj la vidvino por Milano. Multis la larmoj, la dankoj, la promesoj de reciprokaj vizitoj. Ne malpli tenera, escepte larmojn, estis la adiaŭo de Renzo kaj ties familio al la gastiganta amiko: kaj ne kreu ke kun Don Abbondio la afero okazis malvarme. Tiuj bonmoruloj ĉiam gardis respektan korinklinon al sia parokestro; kaj ĉi-lasta, malgraŭ ĉio, daŭre amis ilin. Sed bedaŭrinde ja la benataj personaj interesoj fuŝas la am-sentojn.

Se demandi, ĉu ne estis ankaŭ iom da ĉagreno ĉe disiĝo disde la naskiĝ-vilaĝo, disde tiuj montoj: jes ja, estis ankaŭ da ĝi: ĉar da ĉagreno estas, mi aŭdacas diri, ĉiuloke. Tre verŝajne tamen ĝi ne estis tre akra, ĉar ili povus resti, nun kiam la du

¹⁵ *du akademioj*: du ekonomikaj skoloj de la XVIII jarcento: unu favora al agrikulturo, dua al industrio.

gravaj malhelpoj, nome Don Rodrigo kaj la ekzil-dekreto, estis forigitaj. Sed jam delonge ili kutimis taksi kiel sian landon tiun, al kiu ili estis almigrontaj. Renzo jam plaĉigis ĝin al la virinoj, rakontante la avantaĝojn, kiujn tie trovas la laboristoj, kaj cent detalojn pri la tiea bela viv-maniero. Cetere ili estis travivintaj malfeliĉegajn momentojn en la lando, al kiu ili estis turnontaj la dorson; kaj malfeliĉaj memoroj daŭre fuŝas en la menso la lokojn, kiuj memorigas ilin. Kaj se temas ĝuste pri la lokoj, kie oni naskiĝis, eble restas en ties memoro io pli akra kaj pika. Eĉ la infano, diras la manuskripto, volonte ripozas sur la brusto de mamnutristino, serĉas avida kaj fideme la mamon kiu dolĉe nutris lin ĝis tiam; sed se ŝi, por lin demamigi, ŝmiras ĝin per maldolĉaĵo, la infano retiras la buŝon, poste li reprovos, sed fine li tute demamiĝas; ja plorante, sed demamiĝas.

Kion nun vi diros, se vi sciiĝos, ke, tuj kiam ili alvenis kaj sin aranĝis en la nova lando, Renzo trovis jam pretajn ĉagrenojn? Bagatelaj malfeliĉoj, sed sufiĉas tute malmulte, por ĝeni feliĉan staton! Jen, per kelke da vortoj, la afero.

La onidiroj pri Lucia atingis la vilaĝon longe antaŭ ŝia alveno; la sciigo, ke Renzo multege suferis pro ŝi, restante daŭre firma, daŭre fidela; eble kelke da vortoj de amikoj, iom tro partiemaj por li kaj ĉiuj liaj aferoj, estigis ian scivolon vidi la junulinon, kaj ian atendon pri ŝia beleco. Nu, vi ja scias kia estas la homa atendo: imagema, kredema, senŝancela; sed ĉe l' konkreta konstato, ĝi estas tro rafinita, tro postulema: ĝi trovas nenion sufiĉa, pro tio ke ĝi ne sciis, kion entute ĝi volis; kaj ĝi pun-pagigas senkompate la dolĉon senbaze atenditan. Kiam do aperis ĉi tiu Lucia, multe da homoj, kiuj eble kredis, ke ŝi devas havi tute orajn harojn, tute rozajn vangojn, kaj plej

belan okulparon, kaj mi ne scias kion, komencis levi la ŝultrojn, grimacigi la nazon, kaj diri: «he! ĉu temas pri ŝi? Post tiom da tempo, post tiom da paroloj, atendeblis io pli bela. Kio do estas? Kampulino, kiel multe da aliaj. He! da tiaj kaj eĉ pli belaj, troveblas ĉiuloke». Kaj, ekzamenante ŝin detale, oni trovis en ŝi jen unu, jen alian difekton: kaj iuj eĉ trovis ŝin tute malbela.

Dumtempe ke neniu iris sciigi malkaŝe ĉi-aferojn al Renzo, okazis nenio rimarkinde malbona. Sed malbonfaris iuj, kiuj tion al li raportis: kaj Renzo, kion diri? sentis sin ofend-pikita. Li komencis remaĉi la aferon, kaj plendegi kaj kun la raportintoj, kaj pli longe kun si mem. – Kaj kio vin interesas? Kiu do al vi diris, ke vi atendu? Ĉu mi iam venis paroli al vi pri ŝi? kaj al vi diri ke ŝi estas belulino? Kaj kiam vi mem tion diradis, kion mi al vi respondis, krom ke ŝi estas bonvirta junulino? Ŝi estas kampulino! Ĉu mi iam diris, ke mi alkondukos principinon? Ĉu ŝi al vi ne plaĉas? Ne rigardu ŝin. Da belulinoj vi ja havas: tiujn vi rigardu. –

Kaj vidu do, kiel bagatelo foje sufiĉas por kondiĉi homan staton dum la tuta vivo. Se Renzo devus trapasi la sian en tiu vilaĝo laŭ sia unua plano, ĝi estus ne gaja vivo. Per plia kaj plia incitiĝo, fine fariĝis li mem incitema. Li estis malafabla kun ĉiuj, ĉar ĉiu ajn povus esti unu el la kritikantoj de Lucia. Verdire li traktis ilin ne malbontone; sed vi ja scias kiom da belaj aferoj oni povas fari, tute ne ofendante la regulojn de bontono: eĉ ventro-fendi¹⁶. Li havis en ĉiu vorto ion akran; en ĉio ankaŭ li mem trovis ion kritikinda, tiom ke, se veteraĉis dum du sinsekvaj tagoj, li tuj diris: «kompreneble, en tia ĉi lando!». Al vi mi diras, ke ne malmultaj komencis lin malŝati,

¹⁶ *ventro-fendi*: aludo pri dueloj, ankoraŭ aktualaj epoke de Manzoni.

eĉ homoj, kiuj antaŭe havis por li amsenton; kaj ĉe l' tempopaso, aferon post afero, li troviĝus tiel dire en milito kontraŭ la preskaŭ tuta loĝantaro, eble ne konante li mem la unuan kaŭzon de tiel granda malbono.

Sed oni preskaŭ rajtas diri, ke la pesto mem surpronis la taskon ĝustigi ĉiujn liajn misfarojn. Fakte ĝi formortigis la mastron de alia ŝpinejo, situanta preskaŭ ĉe l' pordegoj de Bergamo; kaj l' heredinto, juna diboĉulo, kiu en tiu tuta konstruaĵo trovis nenion amuza, volis kaj eĉ deziregis ĝin forvendi, eĉ duon-preze; sed li postulis kontantan monon, por tuj povi monon foruzi en ne produktivaj elspezoj. Bortolo, kiam la afero atingis liajn orelojn, rapidis tien por vidi; li traktis: pli avantaĝajn paktojn oni ne povus esperi; sed tiu nepra kondiĉo pri l' kontanta mono fuŝis ĉion, ĉar tiu, kiun li amasigis iom post iom per longa ŝparado, estis ankoraŭ tre for de l' postulata sumo. Li ne rompis la intertrakton kun la amiko, li rapidis hejmen, komunikis la aferon al la kuzo, kaj al li proponis kunaĉeti ĝin duonpropriete. Tiel bona propono ĉesigis la ekonomikajn dubojn de Renzo, kiu tuj elektis industrion, kaj respondis jese. Ili tien kuniris, kaj oni faris la kontrakton. Kiam la novaj mastroj ekloĝis en sia nova proprietaĵo, Lucia, kiu tie tute ne estis atendita, ne nur ne estis kritikata, sed entute ne malplaĉis; kaj Renzo eksciis, ke pli ol unu diris: «ĉu vi vidis tiun belan anserinon, kiu venis ĉe nin?». La adjektivo pardonigis la substantivon.

Kaj eĉ la ĉagreno travivita en la alia vilaĝo al li havigis utilan instruon. Antaŭe li estis iom tro haste juĝema, kaj li volonte cedis al la emo kritiki alies edzinojn, kaj ĉion ajn. Post tiu travivaĵo, li ekkonsciis ke vortoj impresas iumaniere en la buŝo de diranto, kaj alie ĉe l' orelo de aŭskultanto; kaj li iom

kutimiĝis aŭskulti en si mem siajn vortojn, antaŭ ol ilin eldiri.

Sed vi ne kredu ke mankis kelke da ĝenetoj eĉ tie. La homo (diras nia anonimulo: kaj vi sperte scias, ke li havas ian strangan guston koncerne komparojn; sed vi toleru ankaŭ ĉi tiun, kiu devus esti la lasta), la homo, dum li vivas en ĉi-mondo, estas malsanulo kiu kuŝas sur iel malkomforta lito, kaj vidas ĉirkaŭ si aliajn litojn, ekstere bele ordigitaj, ebenaj, glataj: kaj li imagas ke tie oni certe kuŝas komfortege. Sed se li sukcesas ŝanĝi, tuj kiam li sin aranĝis en la nova, li, premante, komencas sensi jen pikantan spliton, jen premantan ŝvelaĵon: entute li estas en la antaŭa situacio. Kaj tial, aldonas la anonimulo, oni devus plimulte zorgi pri bonfaro ol pri bonstato; kaj tiele oni fine eĉ pli bone status. Ĝi estas iel artifikita, ĝuste laŭ tiama baroka gusto; sed entute prava. Cetere, li daŭrigas, ĉagrenoj kaj implikoj tiaj, kaj tiom akraj, kiel tiuj kiujn ni rakontis, ne plu trafis niajn bonajn rolulojn: ek de tiam temis pri vivo el plej trankvilaj, plej feliĉaj, plej enviindaj; tiel ke, se mi ĝin al vi rakontus, tio vin tedus mortige.

La negocaferoj rave prosperis: komence estis iom da malhelpo pro l' malabundo de laboristoj kaj pro la ne-sperteco kaj la postuloj de l' malmultaj restintaj. Publikiĝis ediktoj, kiuj limigis la laboristajn salajrojn; malgraŭ tiu ĉi helpo¹⁷, la aferoj reakiris la ĝustan direkton, ĉar nepras ke ili fine ĝin reakiru. Alvenis el Venecio alia edikto, iom pli racia: dekjara havaĵa kaj persona senimposteco por almigrintaj laboristoj. Por niaj roluloj tio estis alia feliĉaĵo.

Antaŭ la fino de la unua jaro post la geedziĝo, naskiĝis

¹⁷ *malgraŭ tiu ĉi helpo*: ironie, ĉar, laŭ la liberismaj ekonomikaj teorioj de la aŭtoro, ŝtataj trud-intervenoj neniam vere helpas la ekonomion

bela infano; kaj kvazaŭ por ĝuste havigi al Renzo la oportunon plenumi tiun grand-koran promeson, ĝi estis in-seksa; kaj vi ĝuste rajtas konjekti, ke ŝi estis nomita Maria. Venis poste, ĉe l' tempo-paso, mi ne scias kiom da aliaj viraj kaj inaj beboj: kaj Agnese tute okupita ilin disporti unu post la alia, nomante ilin malbonaĉaj, kaj stampante sur iliaj vizaĝoj tiel premajn kisegojn, ke ili postlasis survange blankaĵon dum iom da tempo. Kaj ĉiuj estis bonmoraj; kaj Renzo volis, ke ĉiuj lernu legi kaj skribi, dirante ke, ĉar ja ekzistas tia ĉi bubaĵo, konvenas ke ankaŭ ili mem ĝin elprofitu.

Bele estis aŭdi lin rakonti siajn aventurojn: kaj li ĉiufoje finis dirante la gravajn aferojn lernitajn, por konduti pli bone estontece. «Mi lernis», li diris, «ne enmiksiĝi en tumultojn: mi lernis ne prediki surplace: mi lernis konsideri kun kia persono mi parolas: mi lernis ne levi tro multe da vin-glasoj: mi lernis ne teni enmane pordo-frapilon, kiam ĉeestas varmaj kapoj: mi lernis ne alligi tintilon al piedo, ne konsiderinte, kio povos el tio estiĝi». Kaj cent aliajn aferojn.

Sed Lucia, kvankam ŝi ne trovis tiun doktrinon en si mem malvera, tamen ne estis pri ĝi kontenta; konfuze al ŝi ŝajnis, ke io mankas. Aŭskultante ripete la saman kanzonon, kaj ĉiufoje ĝin pripensante, «kaj mi», ŝi diris iun tagon al sia moralisto, «kion mi lernu? Mi la malfeliĉojn ne serĉis: ili mem serĉis min. Escepte ke vi volus diri», ŝi aldonis dolĉe ridetante, «ke mia fuŝaĵo estis, ke mi vin amis, kaj promesis min al vi».

Renzo unua-momente konfuziĝis. Post longa kuna debato kaj esploro, ili konkludis ke ofte malfeliĉoj venas ja pro tio, ke oni okazigas ilin; sed ke eĉ plej singarda kaj senkulpa konduto ne sufiĉas por ilin eviti; kaj ke kiam ili venas, kulpe aŭ senkulpe, fido al Dio ilin mildigas kaj utiligas por pli bonvirta

vivo. Tiu ĉi konkludo, kvankam trovita de malriĉaj homoj, al ni ŝajnis tiel prava, ke ni decidis meti ĝin ĉi tie, kiel sukcon de l' tuta historio. Pro kiu, se ĝi ne tute al vi malplaĉis, estu danko al ties verkinto, kaj iomete ankaŭ al ties ĝustiginto. Se male ni sukcesis vin tedi, vi kredu, ke tio ne estis farita intence.

GLOSARO

Notoj:

1. Principe estas notitaj nur signifoj koncernantaj kuntekstojn de la romano.

2. Ni preterlasis vegetaĵojn, kiam la kompreno de la kunteksto ne postulas ties klarigon.

abato – monakejestro.

absorbi – plene okupi la menson.

abstini – rezigni plezurojn.

afekti – malsincere kaj hipokrite ŝajnigi.

agaci – iriti.

akapari - memprofite aĉeti kaj reteni varojn, por igi ilin pli karaj.

akcizisto – oficiala kolektisto de *akcizoj*, t.e. impostoj pro importo de varoj.

akcidenca – ne esenca elemento.

aklami – amase krii favore.

akomodi – adapti, alĝustigi.

akselo – subbrako: anatomia kavaĵo ĉe artikolo de brako kun trunko.

amara – maldolĉa.

amnestio – nuligo de kondamna verdikto.

anheli – spiri pene kaj brue.

anksio – stato de psika streĉiteco, perturbo kaj agitiĝo.

ansero, *anserido* – krom korto-birdo, ĝi povas signifi ‘plumpa mallertulo’.

apelacii – proprasence: alvoki al pli alta juĝtribunalo; vastasence: proteste alvoki.

apika – vertikale kruta.

arbitra – dependa de la sola volo de iu.

arbitracio – solvo de disputo per *arbitracianto*, t.e. ekstera peranto tiucele elektita.

aspra – krude malglata, krude malplaĉa.

aŭditoro – juĝ-oficisto.

aŭguro – prognozigita antaŭsigno.

avanci – iri antaŭen sur milita tereno.

averti – antaŭsciigi kaj atentigi pri danĝero. *avertisto* – komisiito *averti* per tintilo, ke proksimas vivaj aŭ mortaj pestuloj, por evitigi kontakton.

azilo – loko (ekz. preĝejo aŭ monakejo) kien, leĝe aŭ tradicie, ĝendarmoj ne rajtis eniri.

bapto – rito enkonduka en la kristanan religion; ĉe-okaze la nov-kristano ricevas individuan nomon (t.n. *baptonomon*).

barelo – granda ligna, ventroforma vinujo.

barikado – baro de strato per diversaj objektoj, ekz. mebloj kaj traboj.

baroko – kultura movado en Eŭropo ek de la 17-a jarcento. Ties literaturon karakterizis malsobreco, mirigaj troigoj, klasikaj erudiciaĵoj.

bastiono – pordefenda elstara parto de murego aŭ fortikaĵo.

bizara – stranga, fantazieca, malharmonie originala.

blasfemo – malrespekta vortaĉo por ofendi Dion aŭ religiaĵojn.

blazono – ŝildforma insigno de nobelo.

brankardo – portilo de kuŝanta homo, kuŝportilo, port-lito.

braĝo – arda senflama karbero.

bravulo – armita dungito de potenco privatulo.

breviero – libro enhavanta la devigajn ĉiutagajn preĝojn de katolikaj pastroj.

bubono – simptomo de pesto konsistanta el violkolora inflamo de limfo-nodo.

bufono – burleskulo, ŝercemulo.

buljono – nutra likvaĵo el akvo, en kiu estas kuirita viando.

buŝelo – kapacita mezurunuo de grenoj.

ĉefepiskopo - kristana ekleziulo, pli altranga ol episkopo.

ĉielo – paradizo; aŭ respekta anstataŭo, por aludi Dion. *Pro amo al la ĉielo! Pro la ĉielo!* – petegaj interjekcioj.

ĉifro - sekreta skribsigno.

Damo – honora titolo de nobelaj senjorinoj.

damni – kondamni al infera puno; vastasence: pereigi.

daŭbo – ĉiu el la lignaj kurbigitaj tabuletoj, kiuj konsistigas barelon.

debeti – enskribi kiel ŝuldon de iu.

degni – komplezi, sentigante sian moŝtecon aŭ superecon.

deliro – nedaŭra psika malordo, foje kun neracia, senkohera aŭ halucina parolado, ekz. ĉe februloj aŭ ebriuloj.

Deo gratias – latinlingva kristana saluto = Al Dio dankon.

depeŝo – urĝe sendita mesaĝo.

deponi – lasi ĉe iu valoraĵon gardota.

depozicio – deklaro aŭ atesto antaŭ polica aŭ juĝa instanco.

devota – pia, preĝema, kultema.

diocezo – eklezia distrikto regata de *episkopo*.

diplomato – ambasadoro aŭ alia ŝtata oficisto komisiita pri interŝtataj rilatoj. *diplomateco* – sagaca kapablo aranĝi aferojn kun takto.

doĝo – Venecia respublikestro.

domaĝi – ĵaluze konservi aŭ ŝpari.

Don – hispan- kaj ital-lingva honortitolo de pastroj aŭ senjoroj.

doto – havaĵoj (mono, vestoj, garnaĵoj...), per kiuj fianĉino sin provizas por edziniĝo.

drasta – energia, fortege impresanta.

draŝi – bategi.

drola – komike stranga.

dukato – iama arĝenta monero.

duklando – proprasence: feŭdo estrata de duko; sed la Milanan teritorion oni tradicie plu nomis duklando, eĉ post kiam ĝi fariĝis Hispana gubernio.

dupa – tro kredema, naive trompiĝema.

edifi – per bona ekzemplo instigi al bonvirtaj sentoj kaj faroj.

edikto – reĝa aŭ leĝa ordono aŭ dekreto.

ekskomuniko – formala forpelo el la eklezia komunumo.

ekskurso – (en rakonto) provizora dekliniĝo for de la ĉeftemo.

ekskuzi – pravigi kaj pardonigi nean respondon.

ekspedicio – 1. proprasence: grupo de soldatoj, al kiu estas konfidita speciala entrepreno; 2. vastasence: riska entrepreniĝo.

eksplicita – malkaŝe kaj klare dirita.

ekstravaganca – tute sensenca kaj stranga

elokventa – kapabla paroli bele, konvinke, esprimoplene.

embrazuro – mura fendo aŭ aperturo.

enketo – juĝa esploro.

enorma – eksterordinare kruela.

envulto – malica magiaĵo por suferigi aŭ eĉ pereigi.

episkopo – altranga kristana pastro.

ermito – religiulo vivanta en soleco.

eskorti – akompani por gvidi, defendi aŭ honori.

eskudo – iama monero.

esplanado – ebena spaco.

eŝafodo – podio, sur kiu oni ekzekutis kondamnitojn.

fakulto – psika aŭ spirita kapablo.

faldi – duoble aŭ pluroble fleksi tukon aŭ paperon.

falto – vizaĝa haŭtsulketo ordinare kaŭzita de aĝo.

febla – malfortika, senenergia.

feroca – kruelega.

fileto – povas esti karesformo por *viro*; aŭ indiki moralan, spiritan filecon, ekz. rilate ekleziulon (kiun oni nomis *patro*).

fisko – ŝtata administracio.

flasko – vinbotelo kun longa kolo kaj pajlumita ventro.

franĝo – proprasence: garnaĵo el fasketoj de libere pendantaj fadenoj; figurasence: fantaziaj aldonajoj aŭ troigoj.

frat(in)o – la termino povas esti honortitolo de monak(in)o, foje interŝanĝebla kun *patr(in)o*.

frekventi – vizitadi.

frida – malvarma.

frondo – branĉo kun folioj; ĝi povas esti insigno de gastejo.

furunko – dolora haŭta inflamo ofte sub formo de ruĝa ŝvelaĵo, foje vundetaj.

galero – iama ŝipo, por kies remado oni devigis labor-kondamnitojn.

gardanto – (se paroli pri franciskanaj monakoj) monakejestro.

glavo – tranĉa kaj pika batalilo kun longa klingo kaj mallonga tenilo.

grilo – 1. saltanta insekto; 2. (figurasence) frenezeta aŭ stranga ideo, kaprico.

grimaco – streĉo de la vizaĝaj muskoloj, misformante la trajtojn.

grinci – eligi malgrablan, akutan sonon (ekz. per interfrotado de metalaj objektoj).

gruzo – malsubtila sablo, miksitaj kun ŝtonetoj.

gvati – kaŝrigardi.

ĝendarmo – soldato kun tasko garantii en la popolo sekurecon kaj aplikon de leĝoj.

haladzo – forpuŝa odoraĉo

halebardo – lanco kun aldona batalhakilo.

halucino – iluzia vidaĵo, sen-objekta aŭ erara percepto de sensaĵo.

hanti – obsedi, premokupi la psikon.

hardi – igi onin malmola, firma, preskaŭ sensenta.

haspelo – rotacia ilo, por volvi fadenon.

heĝo – barilo el vico de arbedoj aŭ veproj.

hida – forpuŝe, naŭze malbela.

honorario – pago por laboro en t.n. liberalaj profesioj.

hurli – bleki kiel lupoj.

impertinenta – maldece aŭ arogante malrespekta.

indico – signo, kiu probabligas ion.

indukti – rezoni, konkludante el efikoj al kaŭzoj.

influo – laŭ iama koncepto, la peston kaŭzis astrologia influo.

inkubacio – tempo inter ekkontaĝo kaj apero de malsan-simptomoj.

insido – ruza, kaŝa trompaĵo, por malutili.

intrigo – komplika ruzaĵo, por ion efektiviĝi.

invadi – perforte eniri kaj okupi lokon.

investi – elspezi monon por produkto-dona celo.

investituro – akto, per kiu imperiestro aŭ nobelo liveras feŭdon al subranga nobelo.

iriti – forte eksciti, kolerigi.

jelpi - (se paroli pri hundo) eligi akrajn lamentajn blekojn.

jurisdikcio – teritorioj aŭ personoj, super kiuj sin etendas la juĝ-raĵto de iu instanco.

kabalo – artifiko aŭ intrigo

kampanilo – preĝeja sonoril-turo.

kamufli – kaŝmaski, por aspektigi onin alia.

kantonmento – iom longtempa restadejo de soldatoj.

kapelano – kristana pastro kun speciala tasko.

kapitulo – speciala kunsido de monak(in)oj.

kapono – grasigita kaŝtrita koko.

kapto-premio – prezo promesita premie pro kapto (aŭ eĉ mortigo) de malfacile kaptebla kondamnito.

kapuceno – franciskana monako kun rigora regulo.

kardinalo – tre altranga ekleziulo.

karesmo – kristana 40-taga tempo, dediĉata al preĝado, fastado, predikado.

karitato – senprofita amo, predikata kiel ĉefvirto de kristanoj.

kavaliro – iama nobelo, kies honor-sento postulis klopodadon por noblaj idealoj, sed foje kondukis al vantaj puntilioj kaj perfortoj.

kelo – subtera ĉambro, kie oni konservas vinon.

klinko – pordo-fermilo, kiun oni funkciigas, mallevante ĝin en ĉi-cele fiksitan hokon.

kloako – kanalo, tra kiu fluas malpuraĵoj kaj ekskremento.

klostro – monak(in)ejo.

knabo – krom la kutima senco, familiare ĝi povas signifi eĉ plenkreskulon.

knedi – miksi akvumitan farunon, por fari paston.

koĉero – veturigisto de kaleŝo.

koliero – ornama kol-ĉeno.

koluzio – kaŝa konsento por mallaŭdinda celo.

kompensi – ion doni aŭ fari kontraŭpeze de ofendo aŭ damaĝo.

kompleksio - korpa konstitucio.

kompliko – kunkrimanto.

kondotiero – generalo de dungitaj soldatoj.

konestablo – iama armea ĉefkomandanto.

konfesi - laŭ katolika kristana tradicio, pekulo, por ricevi Dian pardonon, *pekkonfesas*, t.e. konfesas pekojn al pastro *konfesprenanto*, kiu foje rolas ankaŭ kiel spirita konsilanto.

konfiski – (se paroli pri publika instanco) forpreni privatan havaĵon.

kongrua – konforma, konvena, responda.

konklavo – kunsido de la kardinaloj, por elekti novan papon.

konjunkcio – speciala astrologia pozicio de du planedoj.

kontempli – medite rigardadi.

konto – kalkulo de negoc-rilatoj. *ŝuldi konton*: devi pravigi rilatojn.

kontricio – pento pro pekoj.

konvalesko – daŭro de transiro el malsana al sana stato.

korporacio – asocio de samprofesianoj, por reciproka helpo.

- korseto* – virina rigida vestaĵo subtenanta la buston.
- korupti* – per donacoj maljuste akiri helpon aŭ favoron.
- krado* – barilo (ekz. ĉe fenestro) el vicoj da staraj stangoj kunigitaj per serio da samspecaj transversaj stangoj.
- kriaĵo* – guberniestra leĝo aŭ edikto, kiun heroldo *kri-*proklamis sur stratoj kaj placoj.
- kristano* – en kristana medio foje la substantivo estas uzata en la ĝenerala senco de ‘homa estulo’; la formoj *kristana* kaj *kristane* povas signifi ‘ĝusta, bonvirta’, kaj respektive ‘ĝuste, bonvirte’.
- kruco* – simbolo de kristanismo, speciale de la suferoj de Jesuo kaj/aŭ de la kristanoj.
- kurta* – mallonga.
- kvalifiki* – taksi.
- kvaranteno* – portempa izolo de personoj aŭ varoj fakte aŭ supoze kontaĝitaj.
- kvesti* – almozpeti monon aŭ donacojn por religiaj celoj.
- kvitanco* – skriba atesto, ke oni ricevis pagon de ŝuldo.
- laiko* – ne pastro; *laika monako* – religiulo sen pastra rango.
- landkneĥto* (neologismo, el la germana *Landsknecht*) – germana dung-soldato, fifama kiel rabema kaj kruela.
- langvoro* – senforteco, malvigleco, pasiveco.
- lanta* – malrapida.
- Latino* - idiomo de la antikvaj Romianoj, pli poste konata nur de ekleziuloj kaj kleruloj.
- lazareto* – kontaĝulejo, pestulejo; la nomo devenas de Lazaro, leprulo menciita en la Evangelio.
- letargio* – stato de inerteco pli profunda ol dormo.
- lici* – esti permesate

likvidi – forpereiĝi.

lirlo – brueto, milda frustrado de moviĝanta akvo.

livreo – galonita uniformo de servistoj de nobelo aŭ riĉulo.

loĝio – galerio, kiun subtenas muroj kaj kolonoj.

Madono - (= Mia Damo): familiara titolo de Maria, sankta patrino de Jesuo; katolikaj kristanoj ŝin alvokas korfavora helpantino. *Trapikita madoneto* – afekta, hipokrita piulino.

magistrato – gvidantaro kaj administrantaro de urbo.

magra – malriĉa, malabunda.

maĥinacio – sekreta, ruza intrigo aŭ komploto.

meĉo - brulfadeno de kandelo.

mentono – parto de la vizaĝo sub la malsupra lipo.

mieno – esprima aspekto de vizaĝo.

milvo – rabobirdo.

minca – maldika, malgrasa.

mistifiko - ruza trompo.

mizerikordo – amo, kompatato, korfavoro: ĝi estas kerna kristana virto.

monatio (neologismo, el la itala *monatto/i*) – pestulistaĉo: viro komisiita kolekti vivantajn kaj mortintajn pestulojn, por ilin respektive konduki aŭ veturigi en pestulejon aŭ al sepulto.

monsinjoro – honortitolo de altrangaj kristanaj pastroj.

morbo – malsano.

morna – preme malĝoja, malserena.

moroza – krude malafabla, malgajhumora.

mortintoj – estas objekto de popola kristana religio. La vortoj: *pro viaj mortintoj!* estas alvoko al ies pieco, por

ion elpeti.

murmuri – eligi obtuzan, malakutan sonon.

muskedo – iama homportata pafilo.

muzelo – elstara parto de la kapo de hundo aŭ simila besto.

navigi - iri sur akvo per tiucela veturilo, ekz. boato aŭ ŝipo.

N.d.A. – Noto de la Aŭtoro.

niĉo – kavaĵo en muro, i.a. por loki statuon.

noci – malutili.

notario – oficisto leĝe rajtigita redakti kaj konservi testamentojn kaj aliajn oficialajn aktojn. *Kriminala notario* – ĉefpolicisto.

novico – kandidat(in)o al monak(in)iĝo. La *novicado* estas provo- kaj lerno-tempo, por fariĝi monak(in)o.

objĉeti – kontraŭdiri.

obsedi – trude, kvazaŭ demone okupi la psikon.

obstrukci – malhelpi cirkuladon per amaso de objektoj.

obtuzo – (se paroli pri sono) malakuta, malklara.

olda – maljuna.

omaĝo – honora respekto.

orbito – okul-kavo.

pado – mallarĝa ter-voĵeto.

paĝio – nobela junulo servanta ĉe pli altranga senjoro.

paliso – ligna stango teren plantita.

panegiro – laŭd-prediko.

paradizo – laŭ la kristana kredo, postmorta feliĉejo de sanktuloj kaj justuloj.

parazito – homo flatema kaj profitema, por kutime manĝi ĉe

flatato.

paroko – eklezia distrikto, kiun regas unu pastro *parokestro*.

paseo – pasinteco.

paŝtisto, aŭ *anim-paŝtisto*, aŭ *anim-zorganto* – (en eklezia medio, laŭ la evangelia parabolo pri Jesuo Bona Paŝtisto:) pastro.

patr(in)o – krom la ordinara senco, la termino povas esti honortitolo de monak(in)o.

paŭto – elstarigo de lipoj en grimaceto esprimanta ofendiĝon, malkontenton, malĝojon.

pekkonfesi – vidu *konfesi*.

perĉeo – mezurunuo de kampoj.

pigra – mallaborema.

pilastro – speco de kolono elstara el muro, sed formanta kun ĝi unu tuton.

pioĉo – fera hakfosilo kun longa ligna tenilo.

plago – katastrofaĵo.

plaŭd(ad)o – bruo de akvo batanta aŭ batata.

plisoj – paralelaj faldetoj ĉe iuj vestaĵoj.

plonĝi - enakviĝi.

plumpa – malgracia, maleleganta.

polento – kuirita pasto el faruno (maiza, aŭ el alia grenaĵo).

pomelo – globforma ekstremaĵo de glav-tenilo.

populara – ŝatata kaj amata de la popolo.

portiko – malfermita konstruaĵo konsistanta el tegmento subtenata de kolonoj.

port-lito – brankardo aŭ hom-portata lito, foje fermita en kajuto.

port-seĝo – seĝo fermita en speco de kajuto kun kurteno kaj porto-stangoj.

povra – kompatinda..

precepto – eklezia ordono aŭ regulo.

predo – rabaĵo.

prelato – altranga pastro.

pretendi – malprave postuli.

prioritato – rajto pasi antaŭ aliulo, pas-raĵto.

prior(in)o – ĉefmonak(in)o.

procesio – religia vica marŝado.

prodaĵo – kuraĝa entreprenaĵo, pri kiu oni fieras aŭ fanfaronas.

prognozo – konjekto pri okazontaĵo surbaze de antaŭsignoj.

prohibi – malpermesi.

proksimulo – laŭ la Evangelio, ĉia homa estulo estas *proksima* al la kristano, kiu tial devas ĉiujn ami, helpi kaj eĉ pardoni.

propeti – helpopeti.

Providenco – saĝa kaj kompata regado de Dio super la homa vivo.

proviantestro – publika funkciulo respondeca pri la publika nutraĵ-provizado.

provincialo – ĉefo de la kapucenoj de tuta (eklezia) provinco.

psalmo – poezia preĝo ĉerpita el la Biblio.

pulso – batado de la arterioj, kaŭzata de la sangofluo.

pulvo – eksplod-pulvoro

puntilio – afero, por kiu oni obstinas, por defendi honoron.

purgatorio – laŭ katolika tradicio, postmorta sufero pro pekoj ne sufiĉe elĉetitaj dumvive.

puso – densa flaveta likvaĵo produktata de infektaj vundoj, bubonoj ktp.

rankoro – malpardonemo kaj venĝemo.

rara – malofta kaj valora.

redukti – malpliigi.

regimento – armea korpuso.

relikvo – restaĵo de korpo de sanktulo, kiel objekto de katolika devoteco.

rento – enspezoj el proprietoj aŭ kapitaloj.

reputacio – publika opinio kaj estimo.

retreto – ceda returniro de armeo.

rezignacii – akcepti senproteste aŭ senreage ion malplaĉan aŭ neeviteblan.

rezoluta – firme decida.

rezono – argumento por ion pravigi.

rifuzi - malakcepti.

riglilo – metala stango, kiun oni enŝovas en tiucela(j)n ingo(j)n, por *rigli*, t.e. fermi pordon aŭ fenestron.

rimorso – konscienc-riproĉo.

ripari – rebonigi.

rivalo – konkuranto.

riverenco – respekta movo de la korpo, konsistanta en sinklino aŭ genu-flekso.

rozario – vico de interkroĉitaj globetoj, por kalkuli la nombron de diritaj preĝoj.

rubando – tute mallarĝa longa tolo.

sagaca – eltrovema kaj lerta solvi malfacilojn.

sakaĵo – pento-vesto.

sakrilegio – malsankta, malpia faro.

sakristiano – viro kun la tasko ordigi kaj disponi la kult-objektojn kaj pastrajn ornatojn gardatajn en *sakristio*, t.e.

apudpreĝeja tiucela ĉambro.

sankcio – puno leĝe fiksita.

sankta Marko – aŭtoro de la dua Evangelio, protektanto kaj simbolo de la Venecia Respubliko.

sankta Marteno – lia festo respondas al la dato 11-a de novembro: ĝi estis limdato de la veto de Don Rodrigo kun grafo Attilio.

satisfakcio – kompenso oferita pro peko.

sbiro – kruda aŭ kruela policisto.

selo – sidilo alligita al dorso de rajdbesto, por ebligi pli komfortan rajdadon.

senjoro – nobelo.

silko - valora kaj brila fadeno, eltirita el sekreciaĵo de silk-raŭpo

simptomo – korpa fenomeno, signo de malsano.

sinistra – malbon-aŭgura.

Sinjoro – (en kristana lingvaĵo) Dio aŭ Jesuo Kristo

skadro – kavaleria taĉmento.

skarlata – brilruĝa.

skrupulo – maltrankviliga problemsento pri moralaj, konsciencaj aferoj.

sombra – donanta impreson de profunda melankolio.

spaliro – ambaŭflanka homa honor-vico.

streta – mallarĝa.

stupo – implikaĵo el krispaj fadenoj.

stuporo – obtuza sen-senteco kaj sen-moviĝo.

sublima – plej altnivela.

subvencio – publika mon-helpo al malriĉuloj.

supre aŭ *tie supre* – foje estas aludo al Dio (tradicie lokita enĉiele).

suspensio – stato de anksia kaj streĉa atendo pri rezulto de risko-plena aŭ mistera okazontaĵo.

sveni – 1. laŭgrade malaperi, forperdiĝi. 2. perdi momente konscion kaj movkapablon.

svarmo – senorde moviĝanta popolamaso.

ŝmiristo – legenda malica disvastiganto de pesto; oni fantaziis, ke ili ŝmiras murojn, pordojn ktp. per infektaj materiaĵoj.

ŝpato - laborilo el fera tranĉa lameno, kun longa tenilo, por plug-fosi kampon.

ŝpini – kuntordi lanon, silkon ktp., por estigi fadenon.

ŝriki – eligi akutan krion.

ŝutro – fenestro-ŝirmilo konsistanta el ligna plataĵo.

tabernaklo – en katolikaj preĝejoj, ŝranketo, kie oni konservas konsekritan eŭkaristian panon.

taĉmento – parteto de armeo.

taksi – oficiale difini la maksimuman vendoprezon de varo.

taluso – artefarita altaĵo el tero.

tedi – ĝeni, lacigi, enuigi.

temerara – sentima malgraŭ grava risko.

tenebro – mallumo.

tenajlo – fera pinĉ-prenilo.

titro - proporcia kvanto de pura metalo, ekz. en monero.

tohuvo – konfuzego, ĥaoso.

torporo – stato de malvigleco kaj ne moviĝemo.

tosto – propono kuntrinki bondezire por ies prospero kaj sano.

trista – malĝoja.

tenera – sentema, montranta mildajn kaj varmajn sentojn.

torĉo – lumilo konsistanta el stango kun unu ekstremo

provizita per brulmaterialo.

uzurpi – senrajte kapti.

vadi – paŝi tra ne profunda akvo.

vepro – tufo el malgrandaj arboj, foje dornaj.

vermiljona – vive ruĝa.

veti – defio, laŭ kiu la homo, kiu evidentiĝos malprava, pagos interkonsentitan sumon.

vibri – ekscitiĝi, agitiĝi.

vindo – tola strio, per kiu oni ĉirkaŭvolvis suĉinfanon.

Virgulino (sankta) – titolo de Maria, virga patrino de Jesuo.

vitejo – vinber-ĝardeno.

volbo – arkforma plafono.

voto – ĵurpromeso farita al Dio aŭ sanktulo. Divers-maniere faris votojn Cristoforo, Gertrude kaj Lucia.

zumi – soni obtuze, kiel ekz. faras fluganta insekto.

Enretigo: Oktobro 2015

www.ueci.it/eldonoj
